


HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



*La ingenia
don Quijote de La M*



Miguel de Ce

La ingênia hidalgo don Quijote de La Mancha

Miguel de Cervantes Saavedra

© De la traduko: Fernando de Diego, 1976.

© De la unua, papera eldono: Fundación Esperanto, 1977.

© De ĉi tiu dua, bita kaj reviziita eldono: [Hispana Esperanto-Federacio](#), 2016.

© De la kovril-bildo: Miguel Gutiérrez Adúriz, 2016.

Versio 1.0.0+2016-07-01. ^[1]

Bitoteko. Hispana Literaturo, 0.

Kreita per libera programaro.^[2]

La eldon- kaj revizi-skipo estas kontaktebla per retpoŝt-adreso quijote@esperanto.es. Ĉia kontribuo por plibonigo estas bonvena.

[1] Vidu en anekso [Historio de versioj](#) pri deŝuto de la lasta versio.

[2] Vidu anekson [Iloj](#).

Prezento

Vi havas antaŭ vi verkon eksterordinaran. Ne nur pro la originalaj teksto kaj lingvaĵo, sed ankaŭ pro la lingvo en kiu ĝi sin prezentas nun.

La traduko de *Don Quijote* en Esperanton estis jam de la komenco de nia lingvo la revo de ĉiuj esperantistoj ligitaj al la hispana kulturo. Tiu revo, post kelkaj antaŭaj partaj provoj, fine plene efektiviĝis paper-forme en 1977, danke al la laborado de nia admirata tradukisto Fernando de Diego kaj al la apogo de Fondaĵo Esperanto kaj de grupo de malavaraj hispanaj esperantistoj.

Hodiaŭ, preskaŭ kvardek jarojn poste kaj ĉe la kvar-jarcenta datreveno de la morto de Miguel de Cervantes, ni profitas de la teknologia progreso kaj faras plian paŝon prezentante tiun ĉi novan bit-forman eldonon danke al la laboro de skipo de volontuloj, kiuj donacis sian tempon kaj talenton por la tasko. Ni tiel esperas pli bone diskonigi tiun ĉi juvelon de la universala literaturo en la plej universala el la lingvoj, sen limoj kaj baroj.

Por Hispana Esperanto-Federacio kaj por Fondaĵo Esperanto estas honore disponigi al la komunumo de parolantoj de la internacia lingvo Esperanto la plej internacian hispanlingvan verkon, nome la aventurojn de la inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha.

José Antonio del Barrio

Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio

Pri la reviziado

Fernando de Diego tradukis *Don Quijote* kiam hejmkomputiloj estis nur ideo de grupeto da revuloj. La skribadon kaj kompostadon de libroj oni faris preskaŭ mane, kaj la solaj iloj de verkisto por revizii siajn tekstojn estis okuloj kaj diligento. Krome, De Diego ne estis pedanta homo: Li uzis plurajn normojn por citiloj, dialog-strekoj, piednotaj klarigoj, akuzativigo de nomoj ktp.

Jen la fazoj de la longa reviziado por ĉi tiu bita eldono:

1. Korekto de eraroj pro la retajpado de la tuta traduko (bedaŭrinde ne aŭtomate tekstigebla per skanilo). Kaj la papera kaj la retajpita tekstoj estis komparataj frazon post frazo.
2. Korekto de ĉ. 220 eraroj en la originala libro (siatempe kompilitaj de Fernando de Diego per la kontribuo de G. Waringhien, L. Knoedt kaj H. Vatr ).
3. Unuecigo de helpo-signoj kaj aliaj. Manke de firma normo en Esperanto por ĉiuj kazoj, ni decidis uzi la hispanlingvan normon (ekzemple, interalie, pri dialog-strekoj kaj citiloj).
4. Korekto de novaj eraroj trovitaj dum la antaŭaj fazoj. Evidentaj eraroj estis korektitaj. Pri eblaj lingvaj eraroj aŭ malklaraj punktoj en la teksto ni ĉiam respektis la stilon de la tradukinto kaj alvenis al decidoj nur komparinte la tradukon kun prestiĝaj hispanlingvaj eldonoj.
5. Fina traserĉado de eblaj tajperaroj, helpe de tiucela programo.

Ni devis koncentriĝi pri la originala teksto kaj do tre malmultajn novajn piednotojn aldonis, kvankam multaj el la

originalaj estis plilongigitaj aŭ reverkitaj. En venonta versio, ni planas aldonon de novaj piednotoj, certe utilaj por internacia publiko.

Por sekuro, la tuta procezo estis dokumentita kaj registrita per tiu-celaj komputilaj programoj. Tiel, iam ajn eblos konsulti tion, kio estis farita ĉiupaŝe, kaj la tiaman staton de la teksto.

Ĉar ĉi tiu bita eldono de *Don Quijote* estas homa verko, ĝi certe ankoraŭ havas erarojn. Feliĉe, la iama pri-komputila revo jam delonge realiĝis: Nun la teknologio ebligas facile kaj rapide korekti kaj publikigi aktualigitan version. Ni kalkulas je vi, leganto, por helpi don Quijote de La Mancha en ĉi tiu nova aventuro. Tamen memoru la saĝajn vortojn de Sancho Panza: «La verkoj haste faritaj neniam finiĝas tiel perfektaj, kiel necesas».

Marcos Cruz kaj Antonio Valén

2016-06

Enkonduko

Kiam preskaŭ sesdekjara Miguel de Cervantes komencis verki en la karcero de Sevilla sian *Don Quijote de La Mancha*, lia ĝistiam viva vidiĝis kiel longa vojo plena de frustracioj kaj senreviĝoj. Cervantes estis viro de noblaj ambicioj kaj, kiel filo de sia glora epoko kaj de la idealoj mezepokaj kaj renesancaj (kiam Hispanio, sub la regado de Karolo la 5-a^[3] kaj Filipo la 2-a, brilas en la zenito de la okcidenta mondo pro la heroeco de siaj soldatoj kaj konkerantoj kaj pro la senegala florado de sia arto kaj literaturo) li aspiris fari al si lokon en la rondo de la grandaj kapitanoj aŭ de la grandaj aŭtoroj. Sed liaj streboj ĉiam renkontis plenan fiaskon: heroe li kondukas en la mar-batalo ĉe Lepanto, kie lia liva mano ricevas paralizan kriplon; oni kondukas lin, kiel kaptiton, al Alĝerio; kun risko de sia vivo li kompletas plurfoje, sed sensukcese, por eskapi; fine, oni liberigas lin kontraŭ elaĉeto de lia persono; denove en Hispanio, li petas, ke oni destinu lin por posteno en Indioj, sed oni ignoras lian peticion; fine oni nomis lin kolektisto de impostoj kaj tial, ke li ne prezentas klarajn kontojn al siaj superuloj, oni lin enkarcerigas, unue en 1592 kaj poste en 1603; li verkas kelkajn teatraĵojn, kies prezentadoj apenaŭ trovas favoran eĥon.

Misfortuno kaj mizero signas ankaŭ lian familian vivon. Li havis am-aferon kun alies edzino, Ana de Rojas, kiu naskas lian filinon Isabel, kaj proksimume en tiu sama tempo li edziĝas al Catalina de Palacios, sed mankas konkordo en ilia komuna vivo. Liaj fratinoj Magdalena kaj Andrea estas elegantaj meretricoj, lia nevino Constanza kondukas same libermore, sed dank' al ilia helpo li povas vivteni sin. Ankaŭ lia filino Isabel havas mavan reputacion, kaj eĉ oni

suspektas, ke la kompatinda Cervantes funkciis parigiste en ŝiaj amoraj aferoj.

Li suferis do, supermezure kaj en propra karno, la teruran kontraston inter la idealoj kaj la faktoj, inter la proza realo de la vivo kaj la bunta mondo de la fantazio. Kaj en tio sendube originis la baza skemo de lia genia *Don Quijote*.

Cervantes ne povis ricevi superan edukon kaj nutras sian kulturon per senĉesa legado de plej diversaj verkoj kaj aŭtoroj, sed sen metodo kaj kohero. Lia provizo de intelektaj konceptoj konsistas pliparte en literaturaj ŝablonoj. Kiam li verkas laŭ la establitaj modeloj de la epoko, li diras nenion originalan kaj klopodas teni sin en la konvenciaj temoj kaj retoriko tiamaj, sed sen la spontano kaj freŝo de Lope de Vega, sen la profunde revolucia liriko de Góngora, sen la satira talento de Quevedo. Laŭ sia ideologio kaj siaj etikaj kaj estetikaj principoj, Cervantes donas la impreson, ke li troviĝas spirite pli proksima al la mezepoko ol al la renesanco, kaj en kelkaj partoj de *Don Quijote* mem, li montras sin malmulte simpatia al iuj aspektoj de la renesanca spirito, por ekzemplo, en la ĉapitro 22-a de la dua parto li ridindigas la tipe renesancan fervoron koni kaj esplori ĉion. Sed, pro ironio de la destino, Cervantes fariĝas sence la ĉefa dissemanto de la ideoj de tiu prototipo de revolucia erudito, de Erasmo de Roterdamo, kies analizo de la homaj impulsoj kiel pozitivaj motoroj de la vivo, eĉ se per ili kreiĝas nur socio absurda, tragika kaj duonfreneza, trovas sian perfektan personiĝon en la figuro de don Quijote.

Sed, kiam Cervantes komencas verki la historion de la fama kavaliro, li liberigas sin de siaj mensaj kaj beletraj stereotipoj, kvazaŭ en stato de tranco, kvazaŭ lin gvidus ia supernatura intuicio, kaj lia koro, prefere al lia menso, spontane verŝas sur la paperon kion li sentas pri la homoj, pri la vivo kaj pri la socio. Nur en la momentoj kiam

Cervantes konscias pri sia rolo de verkisto, li skribas en *Don Quijote* paĝojn palajn, siropajn am-aferojn inter gepaŝtistoj, kies retoriko kaj konceptoj sonas, en niaj oreloj, absolute falsaj kaj tedaj.

Oni verkis ĝis nun centojn da libroj kun la celo klarigi la sekreton, la simbolon de don Quijote kaj de lia ŝildisto Sancho Panza. Evidentas, ke Cervantes ne havis, kiel ĉefan zorgon, kontraŭbatali per don Quijote la furoron de la libroj kavaliraj. Jam en lia epoko tiaj verkoj konsistigis specon de subliteraturo pure distra, same kiel nun, en nia epoko de interplanedaj vojaĝoj, la ordinara publiko trovas sian dozon de eskapismo en la similuloj de la mezepokaj kavaliroj, t.e. en la preskaŭ superhomaj herooj de la televidaj filmoj, aŭ en la heroinoj, kies amaj kaj amoraj prodaĵoj ne tre diferencas de la frivola konduto de la nobelinoj kaj falsaj kampulinoj de la mezepokaj kaj renesancaj romanoj.

Don Quijote estas, ĉefe, humura libro, pli ĝuste, surface humura libro. La ridindaj aventuroj de nia hidalgo, senĉese batata kaj primokata, posedas ian groteskan kvaliton kaj en ili ekspluatiĝas ĝismaksimume la leĝoj de la kontrasto, t.e. la plej sekura rimedo vekti la ridon kaj la amuzon de la leganto. Sed la humuro, almenaŭ la hispana humuro, havas gajan vizaĝon kaj tragikan spiriton. De la pikareskaj antiherooj, samtempuloj de don Quijote, ĝis la modernaj aŭtoroj Wenceslao Fernández Flórez aŭ Enrique Jardiel Poncela, la humuro manifestiĝas kiel amuza pirueto finiĝanta per nukorompa salto en la metafizikon de la vivo.

Don Quijote, kiel socia ento, volas enkonduki la justecon en la mondon batalante kontraŭ ĉiaj arbitroj. Li atingas nur batojn kaj mokojn. Kiel individuo, don Quijote aspiras al la amo, al la prestiĝo de la triumfoj sur la batalkampo, al la gloro. Dum en sia ideala mondo li kredas karesi ravan junulinon, fakte li tenas inter siaj brakoj la fetoran

Maritornes. La amo, en tiel ŝajne amuza sceno, reduktiĝas al sintrompo de niaj sentoj —ne nur de la personaj sentoj de don Quijote— kaj tiel, epizodon post epizodo kaj eventon post evento, Cervantes montras al ni la vivon kiel fenomenon nur elporteblan se oni posedas grandajn dozojn de renoviĝantaj iluzio kaj revemo.

Sed Cervantes eĉ ne vidas en sia kara don Quijote la prototipon de la altaj idealoj de libero kaj justeco. En la fama ĉapitro 22-a de la unua parto don Quijote montriĝas kiel ĉampiono de la libereco, kiam li senĉenigas la galerulojn. Sed jen, subite, don Quijote trudas sian kondiĉon: la galeruloj surmetu denove la katenojn kaj pilgrimu al la hejmo de Dulcinea por omaĝi ŝin. Do la apostoloj kaj herooj, kiuj volas preni de ni niajn katenojn, forĝas samtempe aliajn ĉenojn por teni nin en alispeca sklaveco.

Do, se la pura amo, se la pura libero, se la pura justeco ne ekzistas en la mondo, la eble sola rimedo por elteni la mizeron spiritan kaj materialan de la vivo konsistas en tio, posedi fortan, neŝanceleblan ambicion kaj fervorajn idealojn, kiel okazis al don Quijote en la mondo spirita kaj al Sancho Panza en la fakta kaj konkreta. Kiam don Quijote retrovas la racion, li mortas, kaj el tio ni povas konkludi, ke niaj raciaj kaj logikaj procesoj multfoje estas eĉ pli detruaj kaj absurdaj ol la instinktaj impulsoj kaj la blinda intuo de la obskuraj fortoj de nia koro.

La novelo de la ĉapitroj 33-a kaj 34-a de la unua parto diras al ni, kien ofte kondukas la racio kaj la logiko. Ŝajnas, kvazaŭ Cervantes volus montri, ke ne ekzistas savo por la homa kondiĉo kaj ke, surbaze de la racio aŭ de la pli malpli absurdaj idealoj, nia vojo ĉiam direktas la homaron al fino mizera. Ĉu ne la racio, la logiko kaj la pragmatismo puŝis nian aktualan mondon al la ĥaoso de la tropopuliĝo, la malsato, la polucio, kaj la atomo kiel armo definitiva? Ĉu ne,

kiel diris la genia pentristo Goya, «la revoj de la racio kreas monstrojn»? Kie staras la limo inter la frenezo kaj la racio, inter don Quijote kaj tiuj Anselmo kaj Lotario, la superlogikaj protagonistoj de la menciitaj ĉapitroj?

Krom la filozofia kaj psikologia karaktero de don Quijote-Cervantes-la homaro, la granda libro montras la vastan scenon de la personoj kaj moroj de Hispanio en ties zenita epoko, kiam, jen denove tragika kontrasto, la lando posedis grandan parton de la konata mondo kaj fabelajn trezorojn dum la popolo de urboj kaj vilaĝoj vivis mizere, kaj la nobeloj pigris riĉe kaj lukse sed ankaŭ en spirite kaj intelekte mizera ekzistado, kian tiel majstre pentras Cervantes en la dua parto de sia romano.

La moderna roman-arto havas sian originon en *Don Quijote*. Dostojevski kaj Kafka venas de la fundo tragika kaj despera de Cervantes, dum Charlie Chaplin, alia disĉiplo de la hispana aŭtoro, montras en siaj filmoj lian rideton, kaj lian surfacan humuron.

La hispana originalo de *Don Quijote* estas verkita en lingvo, kies sintakso tre diferencas de la aktuala. Krome, multaj vortoj jam arkaikiĝis kaj aliaj havas semantikan valoron ne kongruan kun la nuna. De tio venas, ke *Don Quijote* ne facile legiĝas en la hispana, kaj ke en kelkaj eldonoj abundegas glosoj kaj klarigoj, same kiel okazas rilate al la verkoj de Shakespeare.

En mia traduko mi plej klopodis fidele reprodukti la ideojn, la atmosferon kaj la stilan ritmon de Cervantes sed, kiam eble, senbalastigis la sintakson kaj tenis min tre ŝpareme rilate al la glosoj. Al mia versio de *Don Quijote* mi dediĉis la plej belajn jarojn de mia vivo, sed mi estas feliĉa, ke nia internacia lingvo kapablas kaj povas prezenti al la mondo la tutan forton kaj vervon de nia glora hidalgo.

La tradukinto

[3] Karolo la 5-a kiel imperiestro de la Sankta Romia Imperio;
Karolo la 1-a kiel reĝo de Hispanio.

La ingênia hidalgo don Quijote de La Mancha

Prefaco^[4]

Neokupata leganto: vi povas kredi, sen ia ĵuro de mia flanko, ke mi dezirus, ke ĉi libro, kiel filo de mia menso, estus plej bela, plej agrabla kaj plej inteligenta. Sed mi ne povis liberigi min de la natura ordo, kiu disponas, ke la filoj simulu al la patroj. Tiel do, kion kapablus generi mia sterila kaj sencia talento, se ne la historion de ido magra kaj sensuka, kapricema kaj plena de plej diversaj fantazioj, kiajn neniam antaŭe imagis ajna persono, se konsideri, krome, ke ĉi ido naskiĝis en prizono, kie sidas ĉia malkomforto, kaj kie ekloĝas ĉia ĝena bruoj? Trankvilo, plaĉa loko, paca kamparo, serena ĉielo, lirlaj fontoj, kaj kvieta spirito, forte influas, por ke eĉ la plej sterilaj muzoj montriĝu fekundaj kaj nasku familion kapablan plenigi la mondon per admiro kaj kontento. Povas okazi, ke patro havas filon turpan kaj sen ia kapablo, sed lia amo al li metas bendon sur liaj okuloj, por ke li ne vidu liajn mankojn: kontraŭe, li konsideras ilin belaĵoj kaj meritoj kaj nomas ilin spritaj kaj brilaj trajtoj antaŭ siaj amikoj. Sed mi estas nur duonpatro de don Quijote, kvankam mi ŝajnas lia patro, kaj ne volas iri en la fluo de la kutimo, nek supliki^[5] vin, preskaŭ kun larmoj en la okuloj, kiel aliaj faras, karega leganto, ke vi pardonu aŭ ignoru la mankojn, kiujn vi vidos en ĉi filo mia. Vi estas nek lia parenco, nek lia amiko, havas vian animon en via korpo, posedas tiom da libera volo kiom oni povus deziri, kaj en via hejmo vi tiel mastras, kiel reĝo en sia palaco. Cetere, vi konas la komun-uzan diron, ke «sub mia mantelo, mi estas mia propra reĝo», sekve, vi estas libera de ĉia devo kaj respekto, kaj povas deklari kion ajn vi pensas pri ĉi historio, sen timi, ke oni punos vin, se vi esprimos pri ĝi mavan opinion, aŭ ke oni rekompencos vin, se vi esprimos bonan.

Mi dezirus nur transdoni al vi la historion nuda, sen la garno de prefaco kaj sen la nekalkulebla serio da sonetoj, epigramoj kaj panegiroj kutime aperantaj, laŭ la modo, ĉe la komenco de la libroj:^[6] ĉar mi povas diri al vi, ke, kvankam kostis al mi ne etan klopodon skribi ĉi verkon, plej igis min peni la preparo de ĉi prefaco, kiun vi legas. Multe da fojoj mi prenis la plumon por komenci ĝin, kaj multe da fojoj mi ĝin lasis, sen scii kion diri. Kaj, kiam foje mi troviĝis meze de ĉi embaraso, kun la papero antaŭ mi, la plumo ĉe la orelo, la kubuto sur la tablo, kaj la vango apogita al la mano, pensante kion mi skribus, eniris neatendite sprita kaj tre inteligente amiko mia, vidis min profunde en pensoj kaj demandis, kio okazas al mi. Mi respondis senkaŝe, ke mi cerbumas pri la prefaco al la historio de don Quijote, kaj ke la afero tiel tedas min, ke mi inklinas ne verki la prefacon kaj eĉ ne publikigi la farojn de la nobla kavaliro.

—Ĉar —mi daŭrigis— mi ne povas ne angori, pensante, kian opinion havos la antikva leĝodonanto nomata publiko, kiam ĝi vidos, ke, post ol mi dormis tiel longan tempon en la silento de la forgeso,^[7] mi reaperas nun, sub la ŝarĝo de multaj jaroj, por prezenti historion sekan kiel esparto, mankan je originaleco, laman en la stilo, mizeran en la ideoj, nudan je erudicio kaj pensoj, sen citoj sur la marĝenoj, kaj sen glosoj ĉe la fino de la libro. Aliaj verkoj, eĉ se profanaj kaj fikciaj, tiel plenas de sentencoj de Aristotelo, Platono kaj la tuta bando de filozofoj, ke la legantoj profunde impresiĝas kaj konsideras iliajn aŭtorojn homoj kleraj, erudiciaj kaj elokventaj. Kaj kion diri pri ilia citado el la Sankta Skribo? Oni pensus, ke ili estas mem Sankta Tomaso kaj aliaj doktoroj de la Eklezio: ili observas ĉi-rilate tiel solenan decon, ke en unu linio ili priskribas distritan amanton, en la alia faras kristanan prediketon, kaj legi aŭ aŭskulti tion donas plaĉon kaj plezuron. Ĉio ĉi mankas al mia libro, ĉar mi havas nenion por citi sur la marĝenoj aŭ por glosi ĉe la fino, kaj eĉ ne scias, kiujn aŭtorojn mi devas aludi, kaj ankaŭ ne

en kiaj okazoj, por poste listigi ilin laŭ alfabeto (kiel la ceteraj verkistoj faras), komencante per Aristotelo kaj finante per Zoilo aŭ Zeŭksiso,^[8] kvankam la unua estis kalumnianto, kaj la dua, pentristo. Mankos ankaŭ la sonetoj ĉe la komenco de la libro, almenaŭ la sonetoj verkitaj de dukoj, markizoj, grafoj, episkopoj, damoj aŭ supergloraj poetoj, kvankam, se mi petus versaĵojn disde du tri amikoj metiistoj,^[9] mi scias, ke ili donus ilin al mi, tiel bonajn, ke ilin ne superus la poemoj de la plej renomaj poetoj de Hispanio. Fakte, kara amiko —mi daŭrigis—, mi decidis, ke sinjoro don Quijote plu kuŝu en la arĥivoj de La Mancha, ĝis la ĉielo disponos, ke alia persono ornamu la libron per la multaj garnoj mankantaj nun al ĝi: ĉar mi sentas min nekapabla ilin provizi pro mia nekompetento kaj eta klero, kaj ankaŭ pro tio, ke mi havas pigran naturon kaj ne emas preni sur min la penon serĉadi aŭtorojn, por ke ili diru kion mi mem povas diri sen ilia helpo. Tial, amiko, vi trovas min en stato de perplekso kaj konfuzo, kiu originas en la sufiĉe grava motivo menciita.

Aŭdinte tion, mia amiko donis al si sur la frunton frapon per la manplato, eksplodis per ridego kaj diris:

—Je Dio, frato, mi ĵus liberigis min de falsa ideo, kiun mi longe havis, de kiam mi konatiĝis kun vi: mi ĉiam opiniis vin diskreta kaj prudenta en via konduto, sed mi vidas nun, ke vi tiel distas de tia opinio, kiel la ĉielo de la tero. Ĉu estas eble, ke aferoj tiel sengravaj kaj tiel facile solveblaj havas la forton konfuzi kaj embarasi talenton tiel maturan kiel la via kaj pli ol sufiĉe harditan rompi obstaklojn pli grandajn kaj venke surtreti ilin? Ĉu vi volas konvinkiĝi, ke mi diras la veron? Nu, aŭskultu atente kaj vi vidos ke, en la daŭro de palpebrumo, mi solvos viajn problemojn kaj trovos rimedon kontraŭ la mankoj, kiuj, laŭ via diro, kaŭzas al vi perplekson kaj timon, ĝis la ekstremo, ke ili igas vin forlasi la ideon

enmondigi la historion de via fama Don Quijote, lumo kaj spegulo de la tuta vaganta kavaliraro.

—Diru —mi respondis— kiamaniere vi agus por ŝtopi la breĉon de mia timo kaj por transformi la ĥaoson de mia konfuzo en klaron?

—Via unua problemo, nome, la sonetoj, epigramoj kaj panegiroj, kiuj mankas al via prefaco kaj devus esti verkitaj de famaj kaj moŝtaj personoj, solveblas, se vi mem prenas sur vin la ioman penon skribi ilin, kaj poste nomas ilin laŭ via plaĉo kaj ilin atribuas al la plumo de Preste Juan de Las Indias aŭ de la imperiestro de Trebizondo,^[10] aŭ ŝajne famaj poetoj, laŭ onidiroj. Kaj, se ili fakte ne versumus, kaj je la nomo de la vero kelkaj pedantoj kaj licenciuloj ĉikanus kaj intrigus kontraŭ vi post via dorso, vi tute ne bezonas zorgi, ĉar, eĉ se ili pruvus vian aserton mensoga, ili ne povus fortranĉi la manon, kiu ĝin skribis.

»Rilate al surmarĝena citado el libroj kaj aŭtoroj, kies sentencojn kaj maksimumojn vi metis en vian historion, sufiĉas nur, ke vi lerte inkluzivigu kelke da sentencoj kaj latinaĵoj, kiujn vi konas parkere, aŭ kiujn vi povas trovi sen granda peno. Por ekzemplo, rilate la temon de libero kaj kaptiteco, vi povus enŝovi: «Non bene pro toto libertas venditur auro»^[11] kaj poste, sur la marĝenon, citi Horacion, aŭ ĝian veran aŭtoron. Se vi traktus pri la povo de la morto, vi povus helpi vin per:

Pallida mors aequo pulsata pede
pauperum tabernas
regumque turres^[12]

»Se vi parolus pri tio, ke Dio ordonas ame kaj amike kondukti kontraŭ la malamiko, tuj citu el la Sankta Skribo, kion vi povas fari kun eleganto, ripetante, almenaŭ, la vortojn de

Dio mem: «Ego autem dico vobis: diligite inimicos vestros».
[13] Se temus pri mavaj pensoj, ripetu kun la Evangelio: «De corde exeunt cogitationes malae».[14] Se pri la nestabilo de la amikeco, jen Katono kun sia distiko:

Donec eris felix, multos numerabis amicos,
Tempora si fuerint nubila, solus eris.[15]

»Kaj dank' al ĉi latinaĵoj kaj aliaj similaj, oni eĉ konsiderus vin latinisto, kies profesio donas en la nuna tempo ne etan honoron kaj profiton.

»Rilate al la afero meti glosojn ĉe la fino de la libro, certe vi povus agi jene: se vi mencias giganton en via libro, zorgu, ke li estu la giganto Goljato, kaj, per tiel facila procedo, vi havos ĉe-mane grandan noton, por ekzemplo: «La giganto Goljato estis filiŝto. Lin mortigis la paŝtisto Davido per forta ŝtonofrapo en la valo de Terebinto, kiel oni rakontas en la *Libro de la Reĝoj*», kun referenco al la koncerna ĉapitro. Poste, por montri, ke vi havas profundan erudicion, ne nur rilate al la letroj,[16] sed ankaŭ rilate al la kosmografio, enkonduku en vian libron mencion pri la rivero Tajo, kaj tiam vi havos preta alian faman gloson, skribante: «La rivero Tajo ricevis sian nomon de hispana reĝo. Ĝi fontas el loko Tia kaj fluas en la oceanon, kisante la murojn de la fama urbo Lisbono. Laŭdire la sablo de la rivero estas ora»[17] ktp. Se vi skribas pri ŝtelistoj, mi rakontos al vi la historion de Kako,[18] ĉar mi parkere konas ĝin; se pri publikulinoj, la episkopo de Mondoñedo[19] pruntos al vi Lamian, Laidan kaj Floran, kaj tia gloso donos al vi grandan prestiĝon; se pri kruelaj homoj, Ovidio provizos vin per Medea; se pri sorĉistinoj kaj magiistinoj, Homero havas Kalipsoan, kaj Vergilio Circan; se pri kuraĝaj kapitanoj, Julio Cezaro mem pruntos sin al vi per siaj *Komentoj*, kaj Plutarko donos al vi mil Aleksandrojn. Se vi traktas pri amoj kaj konas eĉ nur iomete la toskanan,

baldaŭ vi renkontos la verkon de León Hebreo,^[20] kiu taŭgos al vi supermezure. Kaj se vi ne volas veturi al fremdaj landoj, vi havas hejme la aŭtoron Fonseca,^[21] kies *Pri la amo de Dio* entenas ĉion, kion vi, aŭ la plej inteligenta verkisto, povus deziri rilate al tia temo. Nu, bonvolu iel mencii ĉi nomojn kaj historiojn en via rakonto, kaj lasu al mi la taskon enmeti citojn kaj glosojn. Kaj mi ĵuras, ke per ili mi plenigos la marĝenojn kaj uzos kvar foliojn ĉe la fino de la libro.

»Ni traktu nun pri la referenco al aŭtoroj, kia troveblas en la ceteraj libroj, sed ne en la via. Tio havas facilan solvon, nome, akiri verkon, kie aperas la nomoj de ĉiuj aŭtoroj, de A ĝis Z, kiel vi diras, kaj la saman liston metu en vian libron. Kvankam oni vidus klare, ke vi ne utiligis iliajn ideojn, la afero tute ne gravos; kaj eble ajna idioto eĉ pensos, ke vi inspiriĝis el ĉiuj por la verkado de via simpla kaj senpretenda historio. Sed, eĉ se ne por io alia, tiu longa listo de aŭtoroj utilos, almenaŭ, por doni prestiĝon al la libro, des pli, ke neniu faros al si la zorgon esplori, ĉar al li estas tute indiferece, ĉu vi tenis vin, aŭ ne, al iliaj pensoj aŭ ideoj. Krome, se mi bone memoras, via libro ne bezonas tion, kion, laŭ vi, ĝi malhavas, ĉar la tuta verko estas kondamno kontraŭ la kavaliraj libroj, kaj pri ili Aristotelo diris nenion, Sankta Basilio mencias eĉ ne unu vorton, kaj Cicerono tute mutas. Nek la postuloj de la vero nek la kalkuloj de la astrologio havas rilaton kun la fabelaj absurdoj de via libro, kaj ĝin ne koncernas la geometriaj mezuroj aŭ la refuto de argumentoj laŭ la reguloj de la retoriko; kaj ĝi ne pretendas prediki per mikso de l' o homa kun l' o dia, mikso ne rekomendinda kiel vesto de ajna kristana koncepto. Konvenus, ke vi uzu la imitadon, kaj ju pli perfekta ĝi estos, des pli bona estos via verko. Kaj tial, ke via verko celas nur detrui la aŭtoritaton kaj influon de la libroj kavaliraj en la mondo kaj en la publiko, ne necesas, ke vi prialmozu sentencojn de la filozofoj, konsilojn de la Sankta Skribo, fabelojn de poetoj, paroladojn de oratoroj aŭ miraklojn de

sanktuloj. Vi devas zorgi nur, ke viaj frazoj estu simplaj, signifaj, sobraj, fluaj, bone sonantaj kaj agrablaj, kaj ke viaj esprimoj respegulu laŭeble viajn ideojn, sen ilin impliki kaj kompliki. Zorgu ankaŭ ke, legante vian historion, la melankolia ridu, la gaja ridu pli laŭte, la simpla ne tediĝu, la saĝa admiru la inspiron de la intrigo, la serioza ne koleru, kaj la prudenta ne retenu sian laŭdon. Unuvorte, tenu vian celadon direktita al la objekto detruita la aĉan maŝinon de ĉi libroj kavaliraj, abomenataj de multaj, sed laŭdataj de eĉ pli multaj. Kaj, se vi sukcesos en tio, via sukceso estos vere granda.

Mi aŭskultis en absoluta silento la vortojn de mia amiko, kaj, tiamaniere ili min impresis, ke mi senreplike akceptis ilin kiel bonajn kaj ilin uzis por verki ĉi prefacon, kiu montros al vi, kara leganto, la saĝon de mia amiko, kaj ankaŭ mian bonan sorton, tial, ke mi ricevis tiom da trafaj konsiloj en la ĝusta momento. Kaj vi havos la plezuron trovi senkomplika kaj laŭvera la historion de la fama don Quijote de La Mancha, kiu, laŭ la opinio de la vilaĝanoj de la distrikto Montiel, estis la plej ĉasta amanto kaj la plej kuraĝa kavaliro, kian de multaj jaroj oni ne vidis en la regiono. Mi ne volas emfazi, ke mi faras al vi bonan servon, prezentante al vi tiel faman kaj honestan kavaliron; sed mi volas, ke vi danku min, ke vi konatiĝos kun lia fama ŝildisto Sancho Panza, en kies persono, laŭ mia opinio, mi prezentas al vi epitomon de la sprito propra al la ŝildistoj, kiu sprito dise aperas tra la svarmo de la senutilaj libroj kavaliraj. Kaj, kiel lastaj vortoj, Dio donu al vi sanon, kaj Li ne forgesu min. *Vale.*^[22]

[4] La tuta preface, inkluzive de la poemoj ĉe la fino, estas longa serio da akre satiraj aludoj kontraŭ la poeto kaj dramisto Lope de Vega (1562-1635), kvankam Cervantes

neniam rekte mencias lian nomon. La aŭtoro de *Don Quijote* pafas la sagojn de sia morda kritiko kontraŭ la vanto, la danda parademo, la senbazaj pretendoj al nobeleco, la falsa erudicio, la flato al la vulgara gusto de la publiko, kaj la amaferoj, ĉefe kun Micaela Luján aŭ Camila Lucinda, de Lope de Vega. Samtempe Cervantes atakas ankaŭ lian intiman amikon, Alonso de Castillo Solórzano (1584-1648?), eble, post Cervantes mem, la plej bona novelisto hispana de la 17-a jarcento, kaj eble la aŭtoro, kiu, sub la kaŝnomo Avellaneda, verkis la falsan *Dua Parto de Don Quijote* kiel venĝon kontraŭ la sarkasmoj de Cervantes.

[5] Neologismo por «petegi». Hispane «suplicar»; france «supplier»; angle «supplicate», «entreat».

[6] *Las Rimas* de Lope de Vega, aperinta en 1604, kelkajn monatojn pli frue ol *Don Quijote*, entenas ne malpli ol 28 poemojn laŭdajn al la libro.

[7] Preskaŭ dudek jarojn dormis Cervantes en «la silento de la forgeso», de kiam en 1585 li publikigis sian *Galatea*.

[8] Cervantes aludas al la supraĵa kaj teda erudicio, kaj al la mikso de kristanaj predikoj kun ne tre edifaj epizodoj, troveblaj en diversaj verkoj de Lope de Vega (*El peregrino en su patria*, *El Isidro*, ktp).

[9] Nova sarkasmo kontraŭ Lope de Vega, kies granda amiko Sebastián de Castellanos estis tajloro kaj krome analfabeta poeto.

[10] Proverbe, personigo de neekzistantaj, legendaj homoj, ofte cititaj en kavaliraj libroj. En la Mezepoko oni opiniis, ke Preste Juan (Pastro Johano) estas kristana princo reganta en la orienta parto de Tartario.

[11] «Ne ekzistas sufiĉa oro por aĉeti la bonon de la libereco!». La cito apartenas al la Ezopaj fabloj.

[12] Horacio, libro 1, odo 4.

[13] Latine, el la Biblio (Mateo 5,44): «sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn».

[14] Latine, el la Biblio (Mateo 15,19): «Ĉar el la koro eliras malvirtaj pensoj».

[15] Ĉi tiu distiko apartenas, ne al Katono, sed al Ovidio, libro 1, elegio 9 de *La Tristaj*.

[16] Neologismo. Hispane, «letras»; france, «lettres»; angle, «letters». Gramatiko, retoriko, poezio, juro, teologio, klasikaj lingvoj, ktp, t.e. la bazaj studoj de la antikvaj kleruloj.

[17] Lope de Vega skribis tre similan, supraĵan gloson en sia *La Arcadia*.

[18] Filo de Vulkano kiu ŝtelis de Heraklo liajn bovojn, dum tiu dormis (Vergilio, *Eneado*, 8, 185 kaj postaj).

[19] Laŭnome Antonio de Guevara, ankaŭ fama verkisto. En sia historio pri la tri menciitaj publikulinoj li citis aŭtorojn neekzistantajn. De tio venas la ironio de Cervantes, kiam li diras: «kaj tia gloso donos al vi grandan prestiĝon».

[20] Judo el Lisbono, loĝis en Kastilio, en 1492 pasis al Italio. Li verkis la libron *Dialogoj pri amo* en la itala, sed en la epoko de Cervantes ekzistis almenaŭ tri diversaj tradukoj en la hispanan.

[21] La monaĥo Cristóbal de Fonseca, kies libro *Pri la amo de Dio* eldoniĝis en 1594.

[22] Latina vorto, kiun ĉi tie oni uzas kiel formulon de adiaŭo.

Al la libro de don Quijote de La Mancha

Urganda, la Nekonata^[23]

Libro, se vi zorgos bone
serĉi kleran akompanon,
nu, la dando^[24] ne riproĉos,
ke vi faras mavan faron.
Sed, se vi vin urĝe puŝos
fali en kretenajn manojn,
vi rimarkos, ke la stultaj
trafas ne la ĝustajn klavojn,
kvankam ili fanfaronas
havi superhoman saĝon.

Kaj, ĉar sperto nin instruas,
ke la frondoriĉaj arboj
donas freŝan, plaĉan ombron,
jen, en Béjar, via ŝanco
antaŭ vi reĝ-arbon metis:
princoj floras sur la branĉoj
kaj kun ili unu duko,
nova Granda Aleksandro!
Iru do en ĝian ombron:
sort' sin donas al aŭdaco.

Vi prikantos l' aventurojn
de hidalgo de La Manĉo.
Nocaj libroj de li ŝtelis
la prudenton de la kapo,

kaj tiome lin inspiris
kavaliroj, armoj, damoj,
ke li gajnis Dulcinean
per la forto de la brakoj,
kaj en tio li imitis
la impeton de Rolando.

Garnu ne blazonon vian
per ne propraj rang-ornamoj,
ĉar malico tuj atakas
tion, kio estas ŝajno.
Se aroge vi kondutos,
oni diros kun sarkasmo:
«Kiu Álvaro de Luna,
Hanibalo el Kartago
aŭ la franca reĝ' Francisko
iam plendis pri la fato!». ^[25]
Ĉar ĉielo ne deziris
ke vi havu la kapablon
de la negro Juan Latino, ^[26]
nu, forgesu latinaĵojn.
Ne montriĝu tro subtila
per filozofiaj frazoj,
ĉar, kun tordo de la buŝo,
la sagacaj tuj proklamos:
«Kial vi kuraĝis uzi
tian rubon kaj fatrason?».

Vian nazon ne enŝovu
en alian fremdan vazon,
ĉar, en kio nin ne tuŝas,
oni uzu la singardon:
batoj ofte trafas homojn,
kiuj emas al ĉikanoj,
tiel do, vi nur klopodu

al vi fari bonan famon,
ĉar por ĉiam ridindiĝas
eldonantoj de banaloj.

Ne forgesu, ke absurdas
preni ŝtonon en la manon
(se vi loĝas vitrodomon)
por ĝin ĵeti al najbaro.
Lasu, ke la saĝaj homoj
singardeme faru paŝojn,
kiam ili skribas librojn,
ĉar aŭtoroj de romanoj
destinitaj al puceloj^[27]
verkas nur ekstravagancojn.

[23] Sorĉistino kaj amikino de Amadís de Gaŭlio. Oni nomis ŝin «la nekonata», ĉar ŝi ofte transformiĝis, kaj oni ne rekonis ŝin.

[24] Lope de Vega, kompreneble! Li tre amis inkluzivigi en siajn verkojn sian portreton de belulo.

[25] Álvaro de Luna, favorito de la reĝo Johano la 2-a; post ol fakte li direktis dum multaj jaroj la regnon, li mortis ekzekutita per hakilhako en 1452. Hanibalo, post sia triumfa kampanjo kontraŭ la Romanoj, fine venenis sin. Francisko la 1-a de Francio, kaptita en la batalo de Pavia en 1535, sidis en prizono en Madrid, ĝis li interkonsentis sian liberon kun la hispana imperiestro Karolo la 5-a. Aludo al la ofte senfortuna fino de tro ambiciaj personoj, kia Lope de Vega mem.

[26] Nigra sklavo, poste liberigita, de la duko de Sessa. Fariĝis retorikisto kaj poeto en la latina.

[27] Neologismo: (juna) virgulino.

Amadís de Gaŭlio al don Quijote de La Mancha

Vi, imitanto de la vivo plora,
—de mi spertita, kulpe de despero,
sur Nuda Roko kaj en pent-ofero
post ol mi fuĝis for de stato glora—

sensofigos vin per trink' likvora,
sal-gusta tamen, el okul-sufero,
kaj per ter-vazoj nutros vin la tero,
ne per arĝenta plado aŭ per ora.

Pri tio vi ne dubu: por ĉiamo,
almenaŭ dum la blonda Febo dia
en ĉaro flugos tra la ark' ĉiela,

vi estos plej kuraĝa laŭ la famo;
unualoke rangos lando via;
l' aŭtoro brilos sola kaj modela.

Don Belianís de Greklando al don Quijote de La Mancha

Mi batis, rompis, breĉis, diris, faris
pli ol l' aliaj vagaj kavaliroj;
mi arogantis, lertis per rapiroj
kaj venĝis mil ofendojn, cent mil baris.

La farojn miajn famo ne avaris,
la damoj flatis min kun am-sopiroj,
naniĝis antaŭ mi gigantaj viroj,

kaj la duelojn tute ne mi ŝparis.
Sub mia plando kuŝis la fortuno,
mi kiel ludon traktis la destinon
kaj ĉiam ĝin alfrontis maldorlote.

Kaj, kvankam ĝis la kornoj de la luno
la famo levis min, la paladinon,
vin mi envias, vin, ho don Quijote!

Sinjorino Oriana al Dulcinea de El Toboso

Mi volus kun vi ŝanĝi, Dulcinea,
kastelon Miraflores plus Londono
por la paca, serena monotono
de El Toboso, via loko fea.

Mi volus, ĉe Quijote epopea,
esti vi mem en koro kaj persono
—vi, kiu faris lin feliĉa homo—
kaj vidi lin en lukto apogea.

Ho, kial ne rezistis ĉasto mia
al Amadisaj kisoj, dum vi povis
kun don Quijote vin tenadi virta?

Mi estus enviata, ne envia...:
pro mia cedo, mi nur triston trovis,
dolore pagis pro la vivo flirta.

Gandalín, ŝildisto de Amadís de Gaŭlio, al Sancho Panza, ŝildisto de don Quijote de La Mancha

Laŭdatu, fama homo, ĉar fortuno,
metinte vin al ŝildo-porta servo,
prudente, takte agis per observo,
ke vin atingu nul maloportuno.
Kavalirismo estas sen imuno
kontraŭ krudula aŭ simplula vervo,
mi simple do akuzas sen rezervo
l' orgojlan sopirantan al la luno.
Azeno via, ankaŭ via nomo
kaj via nutrosako providenca
plenigas min per sento de envio.
Laŭdatu re, ho Sancho, bona homo,
ĉar kisas vin kun mildo riverenca
la sola, hispana Ovidio.

De la Spritulo, poeto temo-miksa, al Sancho Panza kaj Rocinante

Al Sancho Panza

Jen mi, Sancho, la ŝildisto
de Quijote de La Mancha:
mi forkuris pied-pele
por vivadi kiel saĝa,
ĉar la fama Villadiego
estis fama kaj konata
pro konvena retiriĝo,
laŭ *La Celestina*—diro,^[28]
libro, laŭ mi, preskaŭ sankta
se ĝi montrus sin pli ĉasta.

Al Rocinante

Jen mi, Rocinante glora,
prapranepo de Babiaca,
mi servutis sub Quijote
pro mia naturo peka.
Ĉiam lastis mi en kuroj,
sed mi estis diligenta
ne maltrafi la furaĝon,
laŭ la stilo de Lázaro:^[29]
li de l' blinda vinon ŝtelas,
metas pajlon kaj sorbetas.

[28] Ĉi versaĵo ŝajnas sarkasmo de Cervantes kontraŭ Castillo Solórzano, kaj aludas, ke iam li devis fuĝi por eviti danĝeran situacion. En la hispana, la proverbo «tomar las de Villadiego» signifas «forkuri», kaj ĝin oni mencias, ŝajne unuafoje, en la fama verko *La Celestina*.

[29] Protagonisto de la pikareska novelo *El Lazarillo de Tormes*. Cervantes ŝajnas aludi, per la du postaj versoj, ke Castillo Solórzano trompis sian grandan amikon Lope de Vega, seksumante kun lia amatino Camila Lucinda. Pli malpli kaŝe Cervantes mencias tiun saman trompon, interalie, en la soneto *De Solisdán al don Quijote de La Mancha*.

Rolando freneza al don Quijote de La Mancha

Se ne parul', vi estas senkompara,
kaj inter miloj certe vi imponis.
Vi ĉiam venkis; vin la venko kronis
kaj metis vin al loko superstara.

Jen mi, Rolando, en vetur' surmara
al gloraj aventuroj mi min donis,
kaj pro Angélica, al fam' proponis
farojn de mia brako temerara.

Sed min vi ne egalas: ĉi parolon
mi diras malgraŭ via brila famo,
ĉar, kiel mi, vi perdis la prudenton.

Mi vin al mi komparos, se la gloron
vi havos batalante maŭran genton...
ĉar vi kaj mi fiaskis en la amo.

De la Kavaliro de la Suno al don Quijote de La Mancha

La glavon vian, mia ne konkeris
—hispana sun', unika kortegano—
nek ankaŭ vian gloron mia mano,
fulmego, kiu venke tra-aeris.

Disdegne imperiojn mi preteris,
kaj oni min suplikis, sed en vano,
okupi ruĝan tronon de sultano:
Claridianan ravan mi preferis.

Mi ŝin adoris pro miraklo rara;
forestis mi, ŝin premis fia sorto,
la venĝon mian timis eĉ infero.

Sed vi, Quijote eminenta, klara,
pro Dulcinea vivas en senmorto,
kaj ŝi, pro vi, en famo, virto, klero.

De Solisdán al don Quijote de La Mancha

Eĉ se, sinjor' Quijote, la deliroj
renversis vian cerbon absolute,
neniu diros, ke vi laŭkondute
similis al fiagaj kavaliroj.

La farojn viajn gloras panegiroj,
ĉar vi arbitrojn frontis, rompintis tute,
eĉ se milfoje vin trabatis brute
friponaj, feĉaj kaj kanajlaj viroj.

Kaj se la ĉarma, bela Dulcinea
de vi sin turnas al alia distro
traktante vin kun koro senkompata,

konsolu vin, ĉe tia sorto vea,
ke Sancho Panza estas fuŝ-peristo:
li stulta; dura ŝi; vi, ne amata.

Dialogo inter Babieca kaj Rocinante

B. Mi trovas vin skeleta, Rocinante.
R. Laboro troas kaj nutraĵo mankas.
B. Pro pajlo kaj hordeo vi ne dankas?
R. La mastro tion manĝas, eĉ konstante.

B. Vi hontu jam kaj ne parolu vante,
la manieroj bonaj al vi strangas,
ofendojn al la mastro vi elkrankas.
R. Azen' ĝis fino vivas azenante.

Jen, vidu lin, en retoj de la amo.

B. Necesas amo?

R. Jes, en kapo stulta.

B. Saĝumas vi...

R. Ĉar manĝon mi ne prenas.

B. Je la ŝildisto plendu.

R. Nul balzamo!

Ĉu plendu mi pro manko aĉa, multa,
kiam kaj li kaj mastro pli azenas?

Ĉapitro 1

Kiu temas pri la stato kaj la vivmaniero de la fama hidalgo don Quijote de La Mancha

En vilaĝo de La Mancha, kies nomon mi ne volas memori, antaŭ nelonge vivis hidalgo el tiuj kun lanco en rako, antikva ŝildo, osta ĉevalaĉo kaj rapida levrelo. Stufaĵo pli ofte bova ol ŝafa^[30] en la matenoj, haketita viando kun salo preskaŭ en ĉiu nokto, grivoj kaj frititaj ovoĵ sabate, lentoj vendrede, kaj plie kolombido dimanĉe prenis tri kvaronojn de lia enspezo. La alian kvaronon konsumis velura saĵo,^[31] pluŝaj kuloto kaj pantofloj por la festaj tagoj, dum en la cetero de la semajno li kontentiĝis portante delikatan lanaĵon.

Li tenis en sia domo mastrumantaron kun pli ol kvardek jaroj, nevinon ankoraŭ ne dudekjaran kaj laborulon doman kaj agran, kiu same okupiĝis selante la ĉevalaĉon kiel uzante serpon.

Nia hidalgo havis proksimume kvindek jarojn. Li estis fortika, magra, kavavizaĝa, frua ellitiĝanto kaj amiko de la ĉaso. Oni diras, ke li portis la nomon Quijada aŭ Quesada (ĉar ekzistas kelka diferenco de opinio inter la aŭtoroj skribintaj pri ĉi temoj), kvankam laŭ seriozaj konjektoj, ŝajnas, ke li nomiĝis Quijana. Sed tio ne gravas al nia rakonto: sufiĉas, ke ĝi ne deviu de la vero eĉ unu solan punkton. Oni sciu do, ke la supre menciita hidalgo, en siaj horoj de neniofarado, t.e. dum la pli granda parto de la jaro, sin fordonis al la legado kun tiom da persisto kaj plezuro, ke li preskaŭ tute neglektis ĉasi kaj eĉ administri sian bienon; kaj ĝis tia ekstremo iris lia scivolo kaj ekstravaganco ĉi-rilate, ke li vendis multajn

akreojn da plugotero por aĉeti kaj legi kavalir-librojn, kaj tiel li prenis hejmen, kiom da ili li trovis. Inter ili, plej plaĉis al li la verkoj de la fama Feliciano de Silva, ĉar ties klara prozo kaj komplikaj rezonoj ŝajnis al li veraj perloj, precipe kiam li legis pri galantaĵoj kaj defioj ofte skribitaj laŭ la jena stilo: «La nekompreneblaj rezonoj, kiujn al mia komprenemo oni prezentas, tiel ŝancelas mian komprenon, ke kompreneble, mi plendas je via belega moŝtulino». Kaj ankaŭ kiam li legis: «La altaj ĉieloj, kiuj vian moŝton dian per steloj fortigas, igas vin merita je la merito, kiun meritas via grandeco».

La kompatinda kavaliro perdadis la saĝon super tiaj rezonoj kaj klopodegis ilin kompreni kaj klarigi al si ties sencon, kvankam Aristotelo mem kaptus neniom kaj eltirus nenian signifon el ili, eĉ se li reviviĝus nur tiucele. Ne tre plaĉis al li la vundoj faritaj kaj ricevitaj de don Belianís, ĉar li imagis, ke lia vizaĝo kaj korpo certe plenis de cikatroj kaj markoj, kiom ajn eminentis la ĥirurgoj lin kuracintaj. Tamen li laŭdis la promeson de la aŭtoro iam daŭrigi kaj meti finon al tiel senfinaj aventuroj, kaj multfoje nia hidalgo sentis la deziron preni mem la plumon kaj alskribi al la libro la finan parton. Kaj sendube tion li entreprenus, kaj eĉ tute plenumus, se ne malhelpus lin aliaj pensoj pli gravaj kaj konstantaj.

Kun la pastro de sia vilaĝo, dokta homo licenciita ĉe Sigüenza, li diskutis multajn fojojn, ĉu estis pli bona kavaliro, Palmerín de Anglujo aŭ Amadís de Gaŭlio. Sed majstro Nicolás, la barbiro de la vilaĝo, diris, ke plej grandis la Kavaliro de la Suno, kaj ke, apenaŭ komparebla kun li, povus esti nur don Galaor, frato de Amadís de Gaŭlio, ĉar Galaor havis komplezeman naturon, ne montriĝis tiel afekte delikata nek tiel plorema kiel lia frato, kaj laŭkuraĝe li rangis eĉ ne unu colon post li.

Resume, la libroj tiel absorbis lin, ke dum la noktoj li legis de helo ĝis helo, kaj dum la tagoj de obskuro ĝis obskuro, kaj

tiel, pro multa lego kaj apenaŭa dormo, sekiĝis al li la cerbo, tiamaniere, ke li tute perdis la saĝon. Lia fantazio pleniĝis per ĉio, kion li legis en la libroj: ensorcĉoj, kvereloj, bataloj, defioj, vundoj, galantaĵoj, am-aferoj, tempestoj kaj neeblaj absurdoj. Kaj tiel fiksiĝis al li en la kapo, ke la tuta aparato de elpensitaj fabeloj estas vera, ke por li ne ekzistis en la mondo historio pli aŭtentika. Li asertis, ke Cid Ruy Díaz estis tre bona kavaliro sed ne komparebla kun la Kavaliro de la Arda Glavo, kiu per unu sola trahako dividis en du partojn paron da ferocaj kaj monstraj gigantoj. Li havis eĉ pli bonan opinion pri Bernardo del Carpio, ĉar ĉe Roncesvalles li mortigis inter la brakoj la ensorcĉitan Rolando, same kiel Heraklo la titanon Anteo. Li laŭde parolis pri la giganto Morgante, ĉar li sola montriĝis afabla kaj ĝentila, kvankam li apartenis al generacio de orgojlaj kaj insolentaj grandeguloj. Sed, precipe, li diris multon bonan pri Reinaldos de Montalbán, ĉefe kiam li image vidis lin elrajdi el sia kastelo, rabi kion li renkontis kaj transmari ŝteli idolon de Mahometo tute oran laŭ la historio. Kaj li volontege fordonus sian mastrumantaron kaj aldone eĉ sian nevinon por la eblo tani la haŭton de la perfida Galalón.

Nu, kiam li tute perdis la saĝon, venis al li en la kapon la plej stranga ideo, neniam antaŭe trafinta frenezulon en ĉi mondo. Ŝajnis al li konvene kaj necese, tiel por grandigo de lia honoro, kiel por servo al lia lando, fariĝi vaganta kavaliro kaj iri tra la mondo kun armaĵo kaj ĉevalo, serĉante aventurojn kaj farante kion, laŭ liaj libroj, plenumis la vagantaj kavaliroj: ripari arbitrojn kaj riski sin en agojn kaj danĝerojn, kiuj, se superitaj, havigas eternan honoron kaj famon. La kompatinda imagis, ke pro la kuraĝo de sia brako li jam ricevis la kronon de, almenaŭ, la imperio de Trebizondo; kaj pelate de la stranga plezuro, kiun vekis en li tiel agrablaj pensoj, li rapidis efektiviĝi sian deziron.

Unue li frote purigis armaĵon, kiu apartenis al liaj praavoj, kaj kiu, rusta kaj ŝima, kuŝadis jam de longega tempo, forgesite, en angulo. Li elfrotis kaj riparis ĝin kiel eble plej bone, sed rimarkis gravan mankon: la kasko estis nur simpla kapopeco sen viziero. Tamen li inĝenie aranĝis tion, ĉar li faris per kartonoj specon de viziero, kiu, fiksita al la kasko, donis al la tuto aspekton de kompleta helmo. Estas vere, ke por vidi, ĉu ĝi havas sufiĉan forton por elteni la hakojn, li elingis la glavon, frapis per ĝi du fojojn la vizieron, kaj jam per la unua bato kaj en unu momento ruinigis kion li antaŭe konstruis dum unu semajno. Ne tre plaĉis al li ĝia facila rompiĝemo, kaj por eviti al si tian danĝeron, li refaris la vizieron metante fer-stangetojn sur ĝia interna flanko, ĝis li kontentiĝis je ĝia eltenemo; kaj ne zorgante submeti ĝin al nova provo, li juĝis la tuton kiel kompletan helmon eksterordinare bonan.

Poste li iris vidi sian ĉevalaĉon, kaj kvankam ĝi havis pli da afekcioj ol realo centavojn, kaj pli da difektoj ol la ĉevalo de Gonela kiu *tantum pellis et ossa fuit*,^[32] ŝajnis al li, ke nek Bucefalo, de Aleksandro la Granda, nek Babieca, de Cid Ruy Díaz, egalas ĝin. Kvar tagojn li pasigis cerbumante kiun nomon li donu al la ĉevalo, ĉar —li diris en si— ne estus juste, ke rajdbesto bona per si mem kaj apartenanta al renoma kavaliro ne havus faman nomon; tial li celis elekti unu, kiu proklamus, kia estis la ĉevalo antaŭ ol ĝia mastro fariĝis vaganta kavaliro, kaj kia ĝi estis nun; vere, se la mastro ŝanĝiĝis al nova stato, ankaŭ la ĉevalo devus alpreni nomon faman kaj laŭte sonantan, kiel decis al lia nova ordeno kaj funkcio. Tiel do, li elpensis, trastrekis, transformis kaj refaris en sia memoro kaj fantazio multajn nomojn, ĝis fine li nomis la ĉevalon Rocinante, nomo, laŭ li, alta, sonora kaj signife indikanta tion, kio la besto antaŭe estis, kaj ankaŭ tion, kio ĝi estis nun: la unua inter ĉiuj ĉevaloj de la mondo.^[33]

Doninte nomon al la ĉevalo tiel konforman al lia gusto, li decidis fari la samon rilate sin mem kaj cerbumadis ok pliajn tagojn ĝis fine lia alprenis al si la nomon don Quijote; kiel supre dirite, sur tio sendube baziĝis la aŭtoroj de ĉi vera historio por konjekti, ke li certe nomiĝis Quijada, ne Quesada, kiel aliaj asertis. Sed memorante, ke la kuraĝa Amadís, ne kontenta je tiu sola nomo, alprenis ankaŭ la nomon de sia regno por famigi ĝin, kaj nomiĝis Amadís de Gaŭlio, same li, kiel bona kavaliro, volis aldoni al sia nomo tiun de sia lando kaj nomi sin don Quijote de La Mancha. Li pensis, ke li tiel proklamus sian familion kaj ankaŭ sian landon, kiun li honoris alprenante ĝian nomon.

La armaĵo jam estis pura, la kasko, kompleta, la ĉevalaĉo havis sian nomon, li la sian, kaj tiam li ekpensis, ke mankas nur serĉi damon, al kiu enamiĝi, ĉar vaganta kavaliro sen am-aferoj similas al arbo sen fruktoj kaj folioj, al korpo sen animo. Li diris en si: «Se pro miaj pekoj, aŭ pro bona sorto, mi renkontos ie giganton, kio ordinare okazas al la vagantaj kavaliroj, kaj mi lin faligos en duelo, aŭ trahakos lin ĉe la mezo de la korpo, aŭ fine venkos kaj submetos lin... ĉu ne estus bele sendi lin, ke li eniru kaj falu sur la genuoj antaŭ mia dolĉa damo kaj diru per voĉo humila kaj servuta: “Sinjorino, mi estas la giganto Caraculiambro, mastro de la insulo Malindrania, kaj venkis min en duelo persona la neniam sufiĉe laŭdata kavaliro don Quijote de La Mancha. Li ordonis, ke mi prezentu min ĉe via moŝto, por ke via ekscelenco disponu je mi laŭ via volo”?» Ho, kiel feliĉis nia bona kavaliro, kiam li faris tian paroladon, kaj eĉ pli, kiam li trovis iun, kiun li povis nomi sia damo! Okazis, laŭ la famo, ke en vilaĝo proksima al la lia vivis juna kampulino de tre plaĉa aspekto, al kiu li foje enamiĝis, kvankam ŝajne ŝi neniam tion sciis kaj eĉ ne suspektis. Ŝi nomiĝis Aldonza Lorenzo, kaj li opiniis ŝin taŭga ricevi la titolon «sinjorino de liaj pensoj». Serĉante al ŝi nomon, kiu iel konvenus al la lia kaj elvokus princinecon kaj grandsinjorinecon, li fine decidis

alnomi ŝin Dulcinea de El Toboso —ĉar El Toboso estis estis ŝia naskoloko— kaj la nomo ŝajnis al li tiel harmonia, rara kaj signifoplena, kiel la ceteraj, kiujn li elpensis por si mem kaj por ĉio sia.

[30] Tiutempe oni taksis pli bongusta kaj valora la viandon ŝafan ol la bovan.

[31] Neologismo: Speco de antikva kazako longa kaj sen butonoj.

[32] Latinaĵo: «tiom da haŭto kaj ostoj ĝi havis».

[33] Don Quijote faras vortoludon. «Rocín» en la hispana signifas ĉevalaĉo, kaj aldonante al li la finaĵon «ante» (kiu povas signifi «antaŭe» kaj «super ĉiuj») li indikis, ke antaŭe ĝi estis «rocín», kaj ke, jam kiel kavalira rajdobesto, ĝi rangas super ĉiuj ĉevaloj.

Ĉapitro 2

Kiu temas pri la unua eliro, kiun el sia vilaĝo faris don Quijote

Tiel preparinte sin, li ne volis plu prokrasti la efektivigon de siaj ideoj, kaj al tio lin puŝis la penso, ke oni lin bezonegas en la mondo, se konsideri, kiel arde li intencis venĝi misfarojn, detruj arbitrojn, ekstermi fiaĵojn, ripari ofendojn kaj kvitigi ŝuldantojn. Tiel do, antaŭ ol helis la tago (kiu estis unu el la plej varmaj de la monato julio), nerimarkate kaj dirinte nenion pri sia intenco, li armis sin per ĉiuj siaj armoj, surmetis la misflikitan kaskon, saltis sur Rocinante, fiksas la ŝildon al la brako, prenis la lancon kaj eliris al la kamparo tra la pordo de la korto, vidante kun ega ĝojo, kiel facile komencis efektivigi lia bona deziro.

Sed apenaŭ li sin trovis en la kamparo, lin frapis terura penso, tia, ke li preskaŭ forlasis la jam komencitan entreprenon. Okazis, ke li subite memoris, ke oni ne armis lin kavaliro; ke sekve, laŭ la leĝoj de la kavalirismo, li nek povos, nek devos batali kontraŭ aliaj kavaliroj, kaj ke, eĉ se laŭceremonie armita, li, kiel novico, devus porti blankajn insignojn,^[34] dum la ŝildo devus montri nenian blazonon, ĝis li gajnus tiun per siaj faroj.

Tiaj pensoj ŝancelis lian intencon, sed lia frenezo superis ĉiun alian konsideron, kaj tiel li venis al la decido, igi, ke la unua renkontoto armu lin kavaliro, kiel ofte okazis en la libroj, kiuj tiel transturnis al li la cerbon. Rilate al la armoj, li pensis elfroti ilin, kiam eble, kaj turni ilin ermene blankaj.^[35] Per tio li trankviligis sin kaj plu rajdis, lasante, ke la ĉevalo

iru laŭplaĉe, ĉar li kredis, ke en tio konsistas la esenco de la aventuroj.

Tiel rajdante, nia novica aventuristo parolis jene kun si mem: «Ĉu ne vere, ke en la venontaj tempoj, kiam ekvidos la lumon la vera historio de miaj famaj faroj, ties klera aŭtoro certe rakontos mian unuan kaj tiel fruan eliron ĉi-maniere?: “Apenaŭ la ruĝvanga Apolono etendis sur la larĝa kaj vasta vizaĝo de la tero la orajn fadenojn de sia bela hararo, kaj apenaŭ la harpaj langoj de la etaj kaj koloraj birdoj salutis per dolĉa kaj mielflua harmonio la alvenon de la roza Aŭroro —kiu, lasinte la molan liton de la ĵaluza edzo, montris sin tra la pordoj kaj balkonoj de la horizonto de La Mancha— kiam la fama kavaliro don Quijote de La Mancha, lasinte la dorm-invitaĵajn plumojn,^[36] sursaltis la faman ĉevalon Rocinante kaj ekrajdis sur antikvaj kaj konataj kampoj de Montiel”». Kaj efektive sur ili li iris. Aldone diris don Quijote: «Feliĉa epoko kaj feliĉa tempo en kiu aperos la famaj faroj miaj, indaj ĉiziĝi en bronzoj, skulptiĝi en ŝtonoj kaj pentriĝi sur tabuloj kiel memoro por la postaj tempoj! Ho vi, kiu ajn vi estas, klera sorĉisto kronikonta ĉi strangan historion, bonvolu ne forgesi mian bonan Rocinante, eternan kompanon mian en rajdoj kaj vagadoj». Poste li diris, kvazaŭ vera enamiĝinto: «Ho princino Dulcinea, mastrino de ĉi servuta koro! Tre afliktis min, ke vi forsendis min, rigore avertante, ke mi ne plu aperu antaŭ via beleco. Degnu, sinjorino, memori ĉi servutan koron, kiu tiel amare suferas pro via amo».

Al tiaj absurdoj li alpinglis ankoraŭ novajn, laŭ la stilo kiun li lernis en siaj libroj, kaj imitante, kiom li povis, ties lingvaĵon. Dume li rajdis tiel lante, kaj la suno penetris tiel rapide kaj arde, ke ties radioj certe fandus lian cerbon, se li posedus ankoraŭ iom da ĝi.

Preskaŭ la tutan tagon li rajdis kaj pro tio, ke nenio notinda okazis al li, li desperis, ĉar li volis plej baldaŭ renkonti iun,

por provi kontraŭ lin la kuraĝon de sia forta brako. Kelkaj aŭtoroj diras, ke lia unua aventuro okazis ĉe Puerto Lápice; aliaj diras, ke ĉe la ventomuelejoj. Sed kion mi eltrovis ĉi-rilate, kaj kion mi legis en la analoj de La Mancha estas, ke li rajdis la tutan tagon, ke noktiĝe lia ĉevalaĉo kaj li sentis sin lacaj kaj duonmortaj de malsato, kaj, ke, rigardante ĉiuflanken por observi, ĉu ie vidiĝas kastelo aŭ paŝtista kabano, kie ili povus ŝirmi sin kaj havigi rimedon al sia multa neceso, li rimarkis, ke ne tre diste de la vojo staras gastejo, kiu aspektis al li kiel stelo gvidanta ne al ia stalo,^[37] sed al alkazaro de savo. Li rapidis kaj alvenis tien, kiam la nokto falis.

Okaze ĉe la pordo de la gastejo staris du junaj virinoj, el la nomataj publikaj, vojaĝantaj kun kelkaj mulistoj, kiuj survoje al Sevilla faris halton por tranokti en la gastejo. Ĉio, kion nia aventuristo pensis, vidis aŭ imagis, similis al la priskriboj de liaj libroj, do kiam li vidis la gastejon, ĝi prezentis sin al li en formo de kastelo kun siaj kvar turoj kaj pinakloj el brila arĝento, eĉ kun levoponto, foso kaj la ceteraj garnoj de tiaj fortikaĵoj.

Li proksimiĝis al la gastejo (kiun li imagis kastelo), je kurta distanco de ĝi li bridis Rocinante kaj atendis, ke iu nano aperu inter la kreneloj kaj trumpetu por anonci la alvenon de kavaliro al la kastelo. Sed vidante, ke la tempo pasas kaj nenio okazas, kaj ke Rocinante deziregas trafi la stalon, li plu rajdis ĝis la pordo de la gastejo, vidis la du junajn putinojn, kaj ili ŝajnis al li du belaj puceloj aŭ graciaj damoj, kiuj distris sin ĉe la pordo de la kastelo.

Okazis tiam, ke unu porkisto, kiu pelis el stoplejo aron da porkoj (mi ne petas pardonon, tiel ili nomiĝas),^[38] blovis per korno, ĉe kies signalo la porkoj ordinare kungregiĝas, kaj don Quijote tuj figuris al si laŭ sia maniero, ke iu nano anoncis lian alvenon, do kun rara kontento li alvenis al la

gastejo kaj al la damoj, kiuj, vidante alrajdi viron en armaĵo kun ŝildo kaj lanco, timoplene sin turnis por eniri en la domon. Sed don Quijote divenis ilian timon pro ilia retiriĝemo, kaj, levante la kartonan vizieron, montris sian magran kaj polvoplenan vizaĝon, samtempe dirante kun serena voĉo kaj ĝentilaj manieroj.

—Viaj moŝtoj ne enkuru, nek timu ian ofendon, ĉar la kavalira ordeno, kies membro mi estas, nek allasas, nek toleras misfaron al ajna virino, des malpli al tiel nobelaj puceloj, kiajn proklamas via aspekto.

La junulinoj lin rigardis kaj klopodis bone distingi lian vizaĝon, kiun la fuŝa viziero duonkovris. Sed aŭdante, ke li nomas ilin puceloj, titolo tiel fremda al ilia profesio, ili ne povis ne ridi tiom kaj tiel, ke don Quijote ekkoleris kaj diris:

—Bone sidas mezuro ĉe la belulinoj, kaj krome estas granda stultaĵo ridi pro leĝeraj motivoj. Sed tiom mi diras, ne por ke vi afliktiĝu aŭ furiozu kontraŭ mi, ĉar mi inklinas sindone servi vin.

Tia lingvaĵo —nekomprenebla por la virinoj— kaj la groteska aspekto de nia kavaliro, kreskigis la rido ĉe ili, kaj la rido, la koleron ĉe li, kaj la afero ne iris ĝis lamentinda ekstremo, ĉar en tiu momento aperis la gastejestro, homo tre dika, sekve pac-ama, kiu (vidante tiel bizaran figuron kaj ties ekipon el lanco, ŝildo kaj armaĵo, malkongruaj inter si kaj ne respondaj al rajd-stilo de don Quijote) apenaŭ povis eviti kunridi kun la puceloj en ties elmontroj de amuziĝo. Sed timante lian arsenalon, li decidis paroli kun prudento, kaj sin esprimis jene:

—Se via moŝto, sinjoro kavaliro, serĉas loĝon, vi trovos ĉi tie abundon de ĉio, sed ne litojn, ĉar ilin ni ne havas.

Vidante la humilon de la ĉefo de la fortreso (ĉar tio ŝajnis al li la gastejestro), respondis don Quijote:

—Io ajn sufiĉas al mi, sinjoro kastelano,^[39] ĉar mia garno estas la armoj; mia amo, la batal'...^[40]

La gastejestro pensis, ke la alia nomis lin kastelano, konfuzante lin kun unu el la sanuloj de Kastilio,^[41] kvankam li estis andaluzo de la plaĝo de Sanlúcar,^[42] do ŝtelema kiel Kako kaj ŝerc-ama kiel studento aŭ paĝio.

—Laŭ tio, la lito de via moŝto estas duraj rokoj, kaj via dormo, vigla star'. Tiel do, bonvolu deĉevaliĝi, kaj vi certe trovos en ĉi kabano okazojn kaj motivojn por teni vin vekita ne unu nokton, sed tutan jaron —respondis la gastejestro.

Tion dirinte, li iris teni la piedingon de don Quijote, kiu deĉevaliĝis kun granda peno kaj malfacilo kaŭze de tio, ke li fastis la tutan tagon. Poste li petis de la gastejestro, ke li bone traktu la ĉevalon, ĉar temis pri la plej bona peco, kiu manĝis panon^[43] en la mondo. La gastejestro rigardis ĝin, kaj ĝi ne ŝajnis al li tiel bona kiel don Quijote diris, eĉ ne duone bona. Tamen li ĝin prenis al la stalo, kaj kiam li revenis por vidi, ĉu la gasto volas ion plian ordoni, li trovis, ke la puceloj, paciĝinte kun don Quijote, estis demetantaj de li la armaĵon. Kvankam ili jam eltiris la platojn de la dorso kaj la brusto, ili, nek sukcesis elsvingi la kolpecon nek sciis elpreni la fuŝitan kaskon, alfiksitan per verdaj rubandoj, kiujn oni devus distranĉi, ĉar la nodojn neniel oni kapablis malligi. Tamen don Quijote tute ne konsentis la tranĉon, do li restis la nokton kun la kasko surmetita, prezentante la plej strangan kaj ridindan figuron imageblan. Kaj dum la ĉiesulinoj demetis de li la kiras-pecojn, li imagis ilin alt-rangaj sinjorinoj kaj damoj de la kastelo, kaj diris grazie kaj sprite:

—Eĉ ne foje kavaliron
tiel bele zorgis damoj,
kiel lacan don Quijote
alvenintan de l' vilaĝo:
lin regalas la puceloj,
kaj princinoj la ĉevalon,

»aŭ Rocinante, kiu, karaj sinjorinoj, estas la nomo de mia ĉevalo, kaj don Quijote de La Mancha la mia. Mi ne volis konigi min al vi, ĝis tion rivelus la faroj, kiujn mi intencis plenumi je via servo, sed la bezono adapti ĉi oldan romancon pri Lanceloto al la nuna okazo motivis, ke vi konas mian nomon tute ekstersezone. Sed venos la tempo, kiam viaj sinjorinaj moŝtoj min ordonos kaj mi obeos, kaj kiam la kuraĝo de mia brako montros, kiel multe mi deziras vin servi.

La junulinoj, kiuj ne kutimis aŭdi tiajn retoraĵojn, respondis eĉ ne unu vorton kaj nur demandis, ĉu li deziras ion manĝi.

—Ion ajn mi manĝus —respondis don Quijote— ĉar, kiom mi scias, ĝi tre konvenus al mi.

Okazis ke tiu tago estis vendredo,^[44] kaj en la gastejo la solan manĝon konsistigis kelkaj pecoj de fiŝo nomata moruo en Kastilio, gado en Andaluzio, merlango en iuj lokoj kaj truteto en aliaj. Oni demandis al li, ĉu lia moŝto dezirus truteton, ĉar oni ne havis alian specion de fiŝo por manĝi.

—Se temas pri multaj trutetoj —respondis don Quijote— ili certe valoras kiel unu sola truto; al mi estas same ricevi ok apartajn realojn aŭ ok-realan moneron. Krome povas esti, ke tiaj trutetoj pli bongustas, same kiel viando bovida pli bongustas ol la bova, kaj la ŝafida, pli ol la ŝafa. Sed, trutetoj aŭ ne, ili venu, ĉar oni ne povas elteni la pezon kaj manipulon de la armoj, se la stomako ne fortas.

Oni metis al li la tablon ĉe la pordo de la domo, ke li estu pli freŝa, kaj la gastejestro surtabligis al li porcion de fuŝe trempita kaj eĉ pli fuŝe kuirita gado kaj panon nigran kaj ŝiman kiel liaj armoj. Sed li iĝis grandioza rid-objekto, ĉar li retenis per unu mano la surmetitan kaskon senmova, kaj per la alia la vizieron levita, do povis preni nenion al si en la buŝon, kaj tion faris anstataŭe unu el la sinjorinoj. Krome al li estus neeble trinki, se la gastejestro, traborinte unu kanon, ne estus metinta unu el ties ekstremoj en lian buŝon, kaj verŝinta vinon en la alian. Ĉion ĉi don Quijote pacience eltenis prefere ol rompi la rubandojn de la kasko.

Dum oni tiel okupiĝis, okaze alvenis al la gastejo unu kastristo de porkoj kaj per sia ŝalmo fajfis tri kvar fojojn, kio fine konvinkis don Quijote, ke li sidas en fama kastelo, ke oni regalas lin per muziko dum la manĝo, ke la gado estas truto, la nigra pano, plej blanka kaj delikata farunaĵo, la putinoj, damoj, kaj la gastejestro, komandanto de la kastelo. Kaj li konsideris, ke ĉio ĉi sufiĉe pravigas lian deciditecon kaj lian eliron el la vilaĝo. Tamen pleje lin tedis, ke li ne kavaliriĝis ankoraŭ, kaj li kredis, ke li ne povas rajte riski sin en aventurojn sen aparteni al ordeno kavalira.

[34] La kavaliroj portis heraldikajn kolorojn kaj emblemojn, ne nur sur la ŝildo, sed ankaŭ sur la insignoj, t.e. sur flagrubandoj de la lanco kaj sur garnaĵoj de iliaj ĉevaloj. Dum la kavaliroj ne plenumis ian notindan faron, iliaj insignoj devis resti blankaj, t.e. sen koloroj kaj emblemoj.

[35] En la hispana «armas» signifas interalie «armojn» kaj «heraldikajn insignojn». Don Quijote, en sia frenezo, konfuzas la insignojn blankajn kun la armoj blankaj, kaj venas al la groteska konkludo elfroti ĉi lastajn.

[36] Antaŭ ol lanon, la antikvuloj uzis plumojn kiel lit-molaĵon.

[37] Aludo al la stelo, kiu gvidis la Tri Reĝojn al la stalo de Bet-Leĥemo.

[38] Ironio kontraŭ la kutimo, ke oni petis pardonon, dirinte la vorton «porko», besto malpura por judoj kaj mahometanoj.

[39] Signifas «kastiliano» kaj «kastelestro». De tio venas la konfuziĝo de la gastejestro, kiam don Quijote donis al li tiun titolon.

[40] Versoj de antikva romanco. La respondo de la gastejestro montras, ke ankaŭ li sciis ĝin.

[41] En la epoko de Cervantes, slanga esprimo por «ŝtelisto».

[42] En Andaluzio, loko, kie abundis vagabondoj kaj friponoj.

[43] Alia amuza manifestiĝo de la frenezo de don Quijote.

[44] Fastotago ĉe la katolikoj.

Ĉapitro 3

Kie oni rakontas pri la amuza metodo de don Quijote
igi sin armi kavaliro

Pelate de tiel ĝenaj pensoj, li hastis konsumi la mizeran
pladon gastejan kaj, fininte ĝin, venigis la mastron, enfermis
sin kun li en la stalo, genuiĝis antaŭ li kaj diris:

—Mi denove stariĝos, kuraĝa kavaliro, nur kiam via ĝentileco
konsentos al mi unu favoron, kiun mi volas peti de vi, kaj kiu
donos al vi gloron, kaj al la homaro, bonon.

La mastro, vidante sian gaston ĉe siaj piedoj, kaj aŭdante
tian lingvaĵon, embarasite gapis lin, kaj sen scii kion fari aŭ
kion diri, nur instigis lin stariĝi; sed vane, ĉar nia kavaliro
rifuzis levi sin, ĝis la mastro promesis konsenti la petitan
favoron.

—Ne malpli mi esperis de via grandanimeco, kara sinjoro —
respondis don Quijote—, kaj mi diru, ke la favoro petita kaj
konsentita estas, ke morgaŭ vi armu min kavaliro. Ĉi-nokte
en la kapelo de ĉi kastelo mi vigilos super la armoj^[45] kaj
morgaŭ, kiel dirite, plenumiĝos mia granda aspiro, kaj mi
rajtos iri al ĉiuj flankoj de la mondo serĉe al aventuroj por la
bono de la suferantoj, laŭ la postuloj de la kavalirismo kaj la
vagantaj kavaliroj, kies farojn deziras mi imiti kavalire.

La gastejestro, kiu, kiel dirite, estis iom mokema kaj havis
jam kelkan suspekton pri la manko de saĝo de sia gasto,
ricevis plenan konfirmon pri tio, aŭskultante lin rezoni; kaj
por amuziĝi tian nokton, li decidis agordi sin al la humoro de
don Quijote, do li diris, ke vere laŭdindas tio, kion nia
kavaliro deziras kaj petas, kaj ke ties aspiroj estas

karakterizaj kaj naturaj en tiel eminenta kavaliro, kiu li ŝajnas, kaj kian montras lia brava aspekto. La gastejestro aldonis, ke ankaŭ li en siaj junaj jaroj sin donis al tiel honora profesio, vagante tra diversaj partoj de la mondo kaj serĉante aventurojn inkluzive en Percheles de Málaga, Islas de Riarán, Compás de Sevilla, Azoguejo de Segovia, Olivera de Valencia, Rondilla de Granada, plaĝo de Sanlúcar, Potro de Córdoba, Ventillas de Toledo kaj ceteraj tiaj lokoj,^[46] kie li ekzercis al si la piedojn rapidi kaj la fingrojn elpluki, kaj kie li faris multajn fiaĵojn, delogis vidvinojn, defloris kelkajn knabinojn kaj trompis plurajn neplenaĝulojn, ĝis fine li iĝis konata en preskaŭ ĉiuj kortumoj kaj tribunaloj de Hispanujo. Fine —li daŭrigis— li retiriĝis al tiu sia kastelo, kie li vivtenis sin per sia propra havo, kaj per havoj fremdaj, kaj kie li gastigis ĉiarangajn kavalirojn, nur ĉar li tre amis ilin, kaj por ke ili dividu kun li parton de sia mono, kiel rekompenco por lia favora dispozicio.

Krome li diris, ke en lia kastelo mankas kapelo, en kiu vigili super la armoj, ĉar ĝin oni malkonstruis kaj intencas restarigi ĝin nova, sed li sciis, ke en okazo de neceso oni povas plenumi tian vigilon ie ajn, do en tiu nokto don Quijote povus posteni tiucele en korto de kastelo, kaj en la mateno, se Dio volos, laŭ la ŝuldataj ceremonioj oni armos lin kavaliro, tiel perfekta kavaliro, kia ne troveblus en la mondo. La mastro demandis al li, ĉu li portas monon, kaj don Quijote respondis, ke li ne havas kun si eĉ la duonon de maravedo, ĉar li neniam legis en la historioj pri vagantaj kavaliroj, ke ili portis iom da ĝi.

Tiam la gastejestro diris, ke li ne pravas, kaj ke, se en la historioj oni preterlasis tiaĵon, tio okazis ĉar la aŭtoroj opiniis, ke ne menciindas afero tiel necesa kaj evidenta kiel la porto de mono kaj puraj ĉemizoj, do li devus akcepti kiel fakton, ke ĉiuj migraj kavaliroj (ĝisŝtope abundaj en tiel multe da libroj) portis burson bone provizitan por ajna

eventualo, kaj ankaŭ ĉemizojn kaj etan skatolon plenan de unĝentoj por kuracado de la ricevitaj vundoj, pro tio, ke sur la kampoj kaj dezertoj kie ili batalis kaj falis vunditaj ne ĉiam troviĝis ĥirurgo. Tia skatolo superfluis, se, kompreneble, ili havis kiel amikon ian kleran sorĉiston, ĉar li tuj helpis ilin, transportante per nuboj tra la aero knabinon aŭ nanon kun fiolo da tiel mirakla akvo, ke, per engluto de ununura guto, vundoj kaj ulceroj tuj malaperis, kvazaŭ estus okazinta nenia difekto. Manke de sorĉisto, la antikvaj kavaliroj certiĝis, ke iliaj ŝildistoj portu provizon de mono kaj aliaj necesajĵoj, kiel ĉarpioj kaj unĝentoj, por kuracado. Kiam kavaliro ne havis ŝildiston, kio apenaŭ okazis, li mem ĉion portis en delikat-ŝtofa dusako, kiu ne tre similis al ordinara dusako, kaj kiu kuŝis sur la grupo de la ĉevalo, kvazaŭ temus pri io negrava. Tamen, nur pro la dirita motivo oni toleris inter la vagantaj kavaliroj la porton de dusako. La gastejestro do konsilis al don Quijote —kvankam li povus ankaŭ ordoni lin ĉar li fariĝos baldaŭ lia baptopatro— vojaĝi de nun kun mono kaj kun la aliaj menciitaj provizoj, kaj aldonis, ke la hidalgo vidus, kiel utilaj li trovos ilin, kiam li malplej tion atendos.

Don Quijote promesis plej precize obei liajn konsilojn, kaj nia hidalgo tuj sekve ricevis la ordonon vigili super la armoj en granda korto apuda al la gastejo. Li kunprenis la armojn, metis ilin sur trogon starantan apud puto, fiksas la ŝildon al la brako, prenis la lancon kaj kun brava teniĝo komencis paŝadi tien kaj tien antaŭ la trogo; kaj kiam komenciĝis la paŝado, komencis fali la nokto.

La mastro rakontis al la ceteraj gastoj pri la frenezo de don Quijote, pri ties vigilo super la armoj, kaj pri lia atendata kavaliro. Mirante pri tiel stranga speco de frenezo, oni iris observi lin de fore kaj rimarkis, ke li foje promenas kun serena teniĝo, foje, apogante sin al la lanco, fikse rigardas la armojn. La nokto fine falis, sed tiel multe helis la luno, ke tiu

povus konkuri per brilo kun sia lumopruntanto, do la novican kavaliron oni tre bone distingis.

Tiam unu el la mulistoj, kiu sidis en la gastejo, volis doni akvon al siaj bestoj, do li devus tiucele formeti la armojn de sur la trogo. Don Quijote, vidante lin proksimiĝi, lin avertis laŭte:

—Ho vi, kiu ajn vi estas, temerara kavaliro, ne tuŝu la armojn de la plej kuraĝa el la vagantoj kiuj zonis al si glavon. Zorgu kion vi faras kaj ne tuŝu ilin, se vi ne volas perdi la vivon page por via aŭdaco.

La mulisto ne nur ignoris la averton —kvankam por la bono de sia sano li estus devinta ĝin obei— sed, prenante je la rimenoj la pecojn de la armaĵo, ilin ĵetis kelkan distancon for. Ĉe tio don Quijote levis la rigardon al la ĉielo, kaj, ŝajne turnante siajn pensojn al Dulcinea, li kriis:

—Asistu min, sinjorino, kontraŭ la unua ofendo adresita al mia brusto vin adoranta. Viaj favoroj kaj protekto montriĝu firmaj en mia unua provo!

Kaj dirante tiajn vortojn kaj aliajn similajn, li lasis la ŝildon, levis dumane la lancon kaj donis per ĝi tian baton sur la kapon de la mulisto, ke li falis teren tiel difektita, ke, se li ricevus duan baton, li ne bezonus la helpon de ĥirurgo.

Tion farinte, don Quijote kunkolektis denove siajn armojn kaj ree paŝadis tien kaj tien tiel flegme kiel antaŭe. Iom poste, ne sciante kio okazis (ĉar la mulisto ankoraŭ kuŝis surtere duonsvena) alia alvenis kun la sama intenco doni akvon al siaj muloj, volis do flankpuŝi la pecojn de la armaĵo por uzebligi la trogon, kaj don Quijote, dirante eĉ ne unu vorton kaj petante nenies favoron, denove lasis la ŝildon kaj levis la lancon, kiu, sen rompiĝi en pecojn, dividis en pli ol tri partojn la kapon de la dua mulisto, ĉar ĝi frakasiĝis en kvar.

Pro la bruo ĉiuj alkuris el la gastejo, kaj inter ili la mastro, kaj don Quijote, tion vidante, pretigis al si la ŝildon, almetis la manon al la glavo kaj diris:

—Ho bela sinjorino, forto kaj inspiro de mia febla koro! Nun estas la tempo, ke via plej alta moŝto turnu la rigardon al ĉi kavaliro, kiu servas vin kaj tiel grandan aventuron frontas.

Ŝajnis al li, ke per tio li akiris tiom da kuraĝo, ke, se lin atakus la tuta multstaro de la mondo, eĉ ne unu paŝon li retroirus. La kompanoj de la vunditoj, vidante la staton de ĉi lastaj, komencis sendi de fore pluvon da ŝtonoj kontraŭ don Quijote, kiu sin ŝirmis kiom li povis per la ŝildo kaj ne kuraĝis apartiĝi de la trogo por ne forlasi la armojn. La gastejestro kriis, ke oni lasu sin sola, ĉar li jam diris al ili, ke don Quijote estas freneza, kaj ke pro lia frenezo oni ne kondamnis lin, eĉ se li mortigus ilin ĉiujn. Ankaŭ don Quijote kriis eĉ pli laŭte, nomante ilin perfidaj kaj kovardaj kaj dirante, ke la kastelmastro estas mizer-kora bastardo, ĉar li toleras tian mistrakton kontraŭ vagantan kavaliro, kaj, ke, se li estus jam en la kavalira ordeno, li igus ilin penti sian perfidon.

—Sed vin, naŭzan kaj fian kanajlaron mi ne atentis! Alĵetu ŝtonojn, ofendu min kiom ajn, sed venu ĉi tien vidi kian pagon vi ricevos por via stulta insolento!

Li diris tion kun tiel brava kaj impeta vervo, ke li teruris siajn atakantojn; kaj parte pro tio, parte pro la admonoj de la gastejestro, ili ĉesis ĵeti ŝtonojn, kaj don Quijote permesis, ke oni retiru la vunditojn, kaj li denove vigilis super la armoj same trankvile kaj silente kiel antaŭe.

La mastro ne trovis tre agrablaj la petolaĵojn de sia gasto kaj decidis, sen perdi plian tempon, tuj meti lin en la damnindan ordenon kavaliran, por eviti novajn misfarojn; li do proksimiĝis al don Quijote, sin ekskuzis pro la insolento de

tiel aĉa kanajlaro, pri kies konduto li diris ke li sciis nenion siatempe, kaj asertis, ke ili ricevis la ĝustan punon pro sia aŭdaco. Li aldonis, ke, kiel dirite, kapelo ne ekzistas tie, sed ke ĝi vere ne necesas por la plenumiĝo de la cetera parto de la ceremonio, kaj ke, laŭ lia scio, la esencon de la kavalirigo konsistigas tio, doni frapeton sur la kolon kaj la ŝultron, kion oni povus fari eĉ meze de la kamparo. Li poste certigis al don Quijote, ke li superplenumis sian devon rilate la vigilon super la armoj, ĉar la reguloj postulas nur du horojn da gardostaro, kaj li postenis dum pli ol kvar.

Don Quijote kredis ĉion ĉi, diris, ke li pretas obei lin kaj petis, ke li finu la aferon plej baldaŭ, ĉar, se oni agresus lin denove, kaj tiam li estus jam kavalirigita, li havis la intencon lasi neniun viva en la kastelo, krom la personoj, kiujn la mastro indikus, kaj kiujn don Quijote domaĝus pro respekto al li.

Timigita kaj tiel antaŭavertita, la gastejestro iris tuj preni la libron, en kiu li prinotadis la pajlon kaj la hordeon liveritajn al la mulistoj, kaj, kun knabo portanta stumpon de kandelo kaj kun la du menciitaj puceloj, li revenis al don Quijote, ordonis lin genuiĝi, eklegis sian manlibron (kvazaŭ li dirus ian preĝon), levis la manon meze de la legado, donis energian frapon sur la kolon de la hidalgo kaj poste per lia propra glavo alian ne malpli fortan sur la ŝultron, ĉiam murmurante tra la dentoj, kvazaŭ li preĝus. Plenuminte tion, li ordonis unu el la damoj zoni al don Quijote la glavon, kion ŝi faris kun multaj prudento kaj aplombo, ĉar multon da ili oni bezonis por ne eksplodi per ridoj ĉe ĉiu momento de la ceremonio, eĉ se la rememoro pri la faroj de la nova kavaliro retenis en ili la ridon. Zonante al li la glavon, diris la bona sinjorino:

—Dio faru vian moŝton tre bonŝanca kavaliro, kaj donu al vi fortunon en viaj bataloj.

Don Quijote demandis al ŝi ŝian nomon, ke li sciu al kiu li ŝuldas la ricevitan favoron, ĉar li intencis rezervi al ŝi kelkan parton de la honoro akirota per la kuraĝo de sia brako. Ŝi tre humile respondis, ke ŝi nomiĝas La Tolosa kaj estas filino de ŝuflikisto de Toledo loĝanta proksime al la vendejoj de la placo Sancho Bienaya, kaj, ke, kie ajn ŝi troviĝos, ŝi servus lin kaj konsiderus lin sia sinjoro. Don Quijote respondis, ke, kiel specialan favoron al li, ŝi bonvolu preni al si la titolon «doña», kaj de nun nomiĝu doña Tolosa. Ŝi promesis tion fari, kaj la alia pucelo alfiksis al li la spronojn kaj havis kun li tre similan dialogon. Li demandis al ŝi ŝian nomon, ŝi respondis, ke ŝi nomiĝas La Molinera kaj estas filino de honesta muelisto en Antequera; ankaŭ de ŝi petis don Quijote, ke ŝi donu al si la titolon «doña» kaj nomiĝu doña Molinera^[47]

Kiam finiĝis la tiel galope hastaj ceremonioj, tute senprecedencaj, don Quijote sentis la urĝegon jam rajdi kaj iri serĉi aventurojn, do tuj sekve selis Rocinante, surpriris ĝin, brakumis la gastejstron kaj dankis al li la favoron de la kavalirigo per tiel ekstravagancaj esprimoj, ke ne eblas ĝuste ripeti ilin ĉi tie. La mastro en sia deziro vidi lin plej baldaŭ for de la gastejo, lakone, sed ne malpli bombaste, respondis lin, kaj, sen peti de li la pagon de la loĝado, tre volonte lin adiaŭis.

[45] Unu el la ceremonioj de kavaliriĝo. Vigili: maldormi (prigarde aŭ prizorge). Armoj: en ĉi tiu kunteksto, resuma formo, kiu signifas samtempe «armiloj» kaj la diversaj pecoj de la armaĵo.

[46] Frekventataj de ĉiuspecaj friponoj kaj vagabondoj en la epoko de Cervantes.

[47] «Don», «doña», estis iam nobelaj titoloj, sed iom post iom ili ĝeneraliĝis, kaj nuntempe ili signifas simple «sinjor(in)o». Cervantes ironias pri ĝia misuzo.

Ĉapitro 4

Kio okazis al nia kavaliro, kiam li forlasis la gastejon

Ĉe la matenruĝo don Quijote ekrajdis de la gastejo tiel kontenta, tiel paradema, tiel ekzalta sin vidi armita kavaliro, ke lia ĝojo ŝvelis krevige ĝis la ventrobendo de lia ĉevalo. Sed rememorante la konsilojn de la gastejestro pri la portendaj necesajoj, speciale mono kaj ĉemizoj, li decidis reveni hejmen, por provizi sin per ili, kaj ankaŭ por dungi ŝildiston; ĉi-rilate li kalkulis je najbaro sia, kampulo malriĉa kun kelkaj filoj, sed tre konvena kiel ŝildoporta servisto de kavaliro. Kun tia penso, li deturnis Rocinante hejmen, kaj la ĉevalo, kvazaŭ jam elflarante la furaĝon de sia stalo, komencis troti tiel vigle, ke ŝajnis, ke ties piedoj ne tuŝis la grundon.

Li rajdis ne longe, kiam ŝajnis al li, ke ĉe lia dekstra mano venis el densejo de arbaro voĉoj delikataj, kvazaŭ de homo veanta, kaj apenaŭ li ilin aŭdis, li diris:

—Mi dankas la ĉielon por ties favoroj, ĉar ĝi tiel baldaŭ prezentas al mi la ŝancon plenumi la devojn de mia profesio kaj pluki la frukton de miaj bonaj intencoj. Tiuj voĉoj venas sendube de senhelpa homo, kiu bezonas mian protekton.

Li ektiris je la brido, gvidis Rocinante al la loko, de kie ŝajne venis la voĉoj, rajdis kelkajn paŝojn en la arbaro, vidis ĉevalon alligitan al kverko, kaj, surligitan al alia, knabon proksimume dekkvinjaran, nudan de la talio ĝis la kapo kaj kriantan ne sen motivo, ĉar lin batadis per leda zono fortika kampulo, kiu diris konsile kaj admone ĉe ĉiu frapo:

—Tenu la langon kvieta kaj la okulojn apertaj!

Kaj la knabo respondis:

—Mi ne faros tion alifoje, sinjoro. Je Dio, mi ne faros tion denove, kaj promesas pli bone zorgi de nun la ŝafinojn.

Don Quijote, vidante tion, diris per kolera voĉo:

—Malĝentila kavaliro, ne ŝajnas elegante agresi personon, kiu ne povas sin defendi. Sursaltu vian ĉevalon, prenu vian lancon —ĉar ankaŭ la kampulo havis lancon,^[48] apogitan al la kverko ĉe kies trunko staris la alligita ĉevalo—, kaj mi instruos vin ne agi tiel kovarde.

La kampulo, vidante veni sur sin tian figuron plenan de armiloj, kiu svingis la lancon antaŭ lia vizaĝo, rigardis sin jam senviva kaj respondis kun milda tono:

—Sinjoro kavaliro, ĉi knabon, kiun mi punas, mi tenas kiel serviston, kaj ordinare li paŝtas ĉi-ĉirkaŭe ŝafinaron mian. Sed li estas tiel preteratenta, ke ĉiun tagon li perdas unu ŝafinon. Kaj, ĉar mi punas lian mankon de atento, aŭ lian friponecon, li diras, ke mi tion faras pro avaremo, por ne pagi al li lian salajron. Sed li mensongas, je Dio kaj je mia animo.

—Vi parolas pri mensogoj^[49] antaŭ mi, kota animo? —diris don Quijote—. Je la suno super ni mi ĵuras, ke mi arde deziras trapiki vin per ĉi lanco. Pagu lin tuj, senreplike; se ne, je Dio nin reganta, mi ekstermos kaj neniigos vin en ĉi momento. Jam liberigu lin!

La kampulo klinis la kapon kaj sen respondi eĉ unu vorton malligis sian serviston. Don Quijote demandis al la knabo kion oni ŝuldas al li, kaj li respondis, ke naŭ monatojn po sep realoj monate.

Don Quijote, farinte la kalkulon, trovis la rezulton de sesdek tri realoj kaj ordonis la kampulon, aŭ pagi ilin tuj, aŭ pagi

per sia vivo. La timigita viro deklaris, je sia danĝera situacio kaj je sia farita ĵuro (kvankam li ĵuris ankoraŭ nenion), ke la ŝuldo ne estas tioma, ĉar oni devus depreni la koston de tri paroj da ŝuoj, kiujn li havigis al la knabo, kaj unu realon por du sang-eltiroj okaze de malsano.

—Tre bone —respondis don Quijote—. Sed per la nemerititaj batoj, kiujn li ricevis, li kompensas la ŝuojn kaj la sang-eltirojn. Se li rompis la ledon de viaj ŝuoj, vi rompis al li la ledon de lia korpo; kaj se la ĥirurgo tiris sangon el li, kiam li malsanis, vi ĝin eltiris nun, kiam li sanas; do ĉi-rilate li ŝuldas al vi nenion.

—La afero estas, sinjoro kavaliro, ke mi ne portas monon... Andrés akompanu min al mi, kaj mi pagos al li la tuton, realon sur realon.

—Akompani lin? —diris la knabo—. Je Dio, ne, sinjoro! Neniam! ĉar, se li refoje vidus sin sola kun mi, li senhaŭtigus min, kvazaŭ Sanktan Bartolomeon.

—Tion li ne faros —respondis don Quijote—. Sufiĉas, ke mi ordonu, por ke li obeu. Nur li ĵuru je la ordeno kavalira, al kiu li apartenas, kaj mi lasos lin libera, kaj li nepre pagos.

—Pensu bone kion vi diras, sinjora moŝto —diris la knabo—. Mia mastro nek apartenas al ordeno kavalira, nek estas kavaliro, sed Juan Haldudo la riĉa, vilaĝano de El Quintanar.

—Tio ne gravas —respondis don Quijote—, ĉar kavaliroj povas ekzisti ankaŭ en la familio Haldudo, des pli, ke ĉiu homo estas filo de siaj propraj agoj.

—Vi pravas —diris Andrés—, sed ĉi mia mastro, de kiaj agoj estas filo, rifuzante al mi la pagon por mia ŝvito kaj laboro?

—Mi ne rifuzas, amiko Andrés —respondis la kampulo—. Bonvolu veni kun mi, ĉar mi ĵuras je ĉiuj kavaliraj ordenoj de la mondo, ke, kiel dirite, mi pagos al vi la tuton, realon sur realon, kaj eĉ parfumitan.^[50]

—La parfumon vi ŝparu —diris don Quijote—. Sufiĉas, ke vi pagu per realoj, kaj mi kontentiĝos je tio. Kaj zorgu plenumi kion vi ĵuris; se ne, je la sama ĵuro mi promesas, ke mi serĉos kaj punos vin, kaj certe vin trovos, eĉ se vi vin kaŝos pli ol lacerto. Kaj se vi volas scii, kiu ordonas tion al vi, por ke vi sentu vin pli devigita obei min, sciu, ke mi estas la kuraĝa don Quijote de La Mancha, riparanto de mistraktoj kaj arbitroj. Dio restu kun vi, kaj vi ne forgesu vian promeson kaj ĵuron, se vi ne volas renkonti la punon eldiritan.

Tion informinte, li spronis Rocinante kaj baldaŭ distanciĝis. La kampulo sekvis lin per la rigardo, kaj kiam li rimarkis, ke nia hidalgo eliris el la arbaro kaj ne plu videblas, sin turnis al sia servisto Andrés kaj diris:

—Venu ĉi tien, amiko, ke mi volas pagi kion mi ŝuldas al vi, laŭ la ordono de tiu riparanto de arbitroj.

—Kaj certe vi pagos —diris Andrés—, ĉar vi tre ĝuste faros, plenumante la ordonon de tiel bona kavaliro, kies vivo daŭru mil jarojn. Li estas tiel brava viro kaj tiel bona juĝanto, ke, se vi ne pagus, li revenus kaj farus kion li promesis.

—Jes, certe mi pagos —diris la kampulo—, sed, por pruvi al vi, kiel multe mi vin amas, mi volas kreskigi mian ŝuldon, por ke ankaŭ la pago kresku.

Kaj, kaptinte lin je la brako, la kampulo refoje surligis lin al la kverko kaj lin tradraŝis, ĝis li opiniis lin duonmorta.

—Nun, sinjoro Andrés —li diris— voku la riparanton de arbitroj, por vidi, kiel li riparos ĉi tion... kvankam povas esti,

ke mi ankoraŭ ne finis, ĉar jukas al mi senhaŭtigi vin vivan, kiel vi antaŭe timis.

Sed fine la kampulo lin malligis kaj permesis lin iri serĉi sian juĝanton, ke tiu plenumu la eldiritan sentencon. Andrés, ĉagrenita, ĵuris, ke li trovos la kuraĝan don Quijote de La Mancha, rakontos al li plej detale la okazaĵon, kaj tiam lia mastro repagos lin sepoble. Sed li foriris plorante, dum lia mastro staris tie kaj ne ĉesis ridi.

Tiamaniere la kuraĝa don Quijote riparigis la arbitron, kaj li ĝojegis pro sia interveno, ĉar, ŝajnis al li, ke li komencis plej glore kaj feliĉe sian kavaliran vagadon. Tre memkontenta do li diris duonvoĉe, survoje al sia vilaĝo:

—Vi certe povas nomi vin feliĉa super la ceteraj virinoj de la tero, ho Dulcinea, plej bela inter la belaj!, ĉar vi havas la fortunon submeti al via volo kaj kaprico tiel kuraĝan kaj renomatan kavaliron, kia estas kaj estos don Quijote de La Mancha, kiu, kiel la tuta mondo scias, hieraŭ eniris en la ordenon kavaliran, kaj hodiaŭ ĉesigis la plej grandan misfaron inspiritan de la arbitro kaj plenumitan de la kruelo: hodiaŭ mi forprenis la vipon de la mano de senkompata malamiko, kiu tute senkaŭze batadis delikatan knabon.

Ĉe tio li alvenis al vojo, kiu dividiĝis en kvar, kaj tuj li memoris la kruciĝejojn, kie la vagantaj kavaliroj haltis por konsideri kiun el la vojoj ekiri. Sekvante do ilian ekzemplon, li haltis momenton kaj, post profunda cerbumado, delasis la bridon de Rocinante kaj submetis sian volon al la ĉevala. Rocinante, obeante sian instinkton, prenis la vojon kondukantan al ĝia stalo, kaj proksimume du mejlojn pretere don Quijote distingis grandan grupon da homoj, kiun formis, kiel li poste sciiĝis, komercistoj de Toledo irantaj aĉeti silkon en Murcia. La grupo konsistis el ses rajdantoj kun siaj ombreloj, kaj ilin akompanis tri servistoj surĉevale kaj kvar

mulistoj piede. Don Quijote, apenaŭ ilin vidis, imagis, ke tie prezentiĝas la ŝanco de nova aventuro, kaj en sia deziro plejeble imiti la renkontiĝojn, pri kiuj li legis en siaj libroj, ŝajnis al li, ke speciale unu el tiaj renkontiĝoj konformas al la nuna situacio kiel ringo al fingro, do kun digna kaj rezoluta mieno li sin firmigis sur la piedingo, premis pli forte la lancon, levis ŝirme la ŝildon al la brusto kaj atendis, meze de la vojo, ke la vagantaj kavaliroj (tiaj li vidis la komercistojn) alvenu. Kiam ili proksimiĝis ĝis la plena vido kaj aŭdo de don Quijote, li levis la voĉon kaj diris kun aroganta gesto:

—Ĉiu haltu kaj konfesu, ke ne ekzistas en la mondo pli bela pucelo ol la Imperiestrino de La Mancha, la senkompara Dulcinea de El Toboso.

La komercistoj haltis ĉe tiaj vortoj, kaj, vidante la strangan figuron de la parolinto, konkludis el la figuro kaj el la vortoj, ke ili staras antaŭ frenezulo; sed ili volis scii pli precize kion li celas per tiu pretendo, kaj unu komercisto, iom ŝercema kaj tre sprita, diris:

—Sinjoro kavaliro, ni ne konas la bonan sinjorinon, kiun vi mencias. Montru ŝin al ni, kaj se ni trovos ŝin tiel bela, kiel vi asertas, plezure kaj propravole ni konfesos la veron, kiun vi petas de ni.

—Se mi montrus ŝin —respondis don Quijote—, kiom valorus konfesi tiel evidentan veron? La esenco de la afero estas, ke, sen vidi ŝin, vi devas kredi, konfesi, aserti, ĵuri kaj defendi, alie, vi, monstra kaj orgojla bando, pretu batali kontraŭ mi. Vi venu unuope, laŭ la reguloj de la kavalirismo, aŭ ĉiuj samtempe, laŭ la kutimo kaj artifiko de la homoj de via fava raso. Ĉi tie mi vin atendas, fidante la forton de mia rajto.

—Sinjoro kavaliro —respondis la komercisto—, je la nomo de la ĉi-tieaj princoj, por ke ne ŝarĝiĝu al ni la konscienco, se ni

atestus kion ni neniam aŭdis nek vidis, des malpli se tio damaĝus la prestiĝon de la imperiestrinoj kaj reĝinoj de La Alcarria kaj Extremadura, ni petas, ke vi bonvolu montri al ni portreton de via sinjorino, eĉ se la bildo estas ne pli granda ol grajno de tritiko, ĉar per la fadeno oni venas al la bobeno. Tiel ni estos konvinkitaj kaj certaj, kaj via moŝto, kontenta kaj feliĉa. Kaj ŝajnas al mi, ke ni tiom inklinas jam al ŝia flanko, ke eĉ se ŝia portreto montrus, ke ŝi strabas per unu okulo, kaj verŝas cinabron kaj sulfuron per la alia, ni dirus ĉion favoran por komplezi vin.

—Ŝi ne verŝas, fava kanajlo! —respondis don Quijote ruĝa de kolero—. Ŝi verŝas, ne kion vi diras, sed ambron kaj cibeton. Kaj ŝi nek strabas nek havas ĝibon, ĉar ŝi iras rekta kiel ŝpinbastono! Vi jam pagu tian blasfemon kontraŭ la grandan belon de mia sinjorino!

Tion dirante, li impetis, kaj kun tia rabio celis per la lanco al lia interparolanto, ke se bonŝance Rocinante ne estus stumblinta kaj falinta, la aŭdaca komercisto pasus tra angora momento. Falis Rocinante, ties mastro ruliĝis kelkan distancon sur la kampo, kaj, kiam li provis levi sin, liaj klopodoj vanis: tiel multe lin embarasis la lanco, ŝildo, spronoj, kasko kaj la pezo de la antikva armaĵo. Kaj dum li sensukcese strebis stariĝi, li kriis:

—Ne forkuru, aro da kovardaj! Mizer-koraj, atendu! Ne pro mia kulpo, sed pro la kulpo de mia ĉevalo mi kuŝas ĉi tie!

Unu el la mulistoj, sendube ne tre bon-intenca, ne povis elteni la arogantan lingvaĵon de la kompatinda kuŝanto sen respondi lin sur la ripojn, kaj proksimiĝinte, prenis lian lancon, rompis ĝin en pecojn, kaj per unu el ili donis tiom da batoj al nia don Quijote, ke, malgraŭ lia armaĵo, li pistis lin kiel muel-ŝtono tritikon.

Liaj mastroj kriis al li, ke li ne batu lin tiel forte, kaj ke li jam lasu lin; sed la mulisto, en sia incititeco, ne volis lasi la ludon sen konsumi en ĝi la tuton de sia kolero, do li prenis la aliajn pecojn de la lanco, kaj ilin rerompis sur la povran kuŝanton, kiu, spite al ŝtormo da batoj falanta sur lin, ne fermis la buŝon, eĉ, minacis ĉielon kaj teron kaj ankaŭ la perversan kanajlaron, ĉar tia li imagis la grupon.

La mulisto fine laciĝis, la komercistoj ekiris denove sur la vojo, kaj, parolante pri la povra disbatito, ili havis sufiĉan komento-temon por la cetero de la vojaĝo.

Kiam don Quijote vidis sin sola, li refoje provis levi sin, sed, se li ne sukcesis, kiam li troviĝis sana kaj forta, kiel li povus nun, tradraŝita kaj preskaŭ pereanta? Malgraŭ ĉio, li rigardis sin bonsorta, ĉar ŝajnis al li, ke lin trafis misfortuno propra al la vagantaj kavaliroj, kaj ke la tuta kulpo estis de la ĉevalo. Sed li havis la korpon tiel kontuzita, ke ne eblis al li stariĝi.

[48] Laŭ la kutimoj de la epoko, ankaŭ kampuloj kaj paŝtistoj portis lancon por eventuala sindefendo.

[49] Uzi la vorton «mensogo» antaŭ honesta homo estis, en la 17-a jarcento, grava manko de respekto kaj konsidero. Tial la indigno kaj furiozo de don Quijote.

[50] Signifis doni la monon kun ĝojo kaj volonto.

Ĉapitro 5

Kie oni daŭrigas la rakonton pri la misfortuno de nia kavaliro

Vidante do, ke, fakte, li ne povas moviĝi, li ricevis la ideon turni sin al sia ordinara rimedo: pensi pri iu evento de siaj libroj, kaj lia frenezo igis lin memori la historion de la markizo de Mantua en la parto, kie Carloto lasas Balduenon vundita en la monto. La historion cetere scias parkere la infanoj, konas la junaj homoj, laŭdas kaj eĉ kredas la oldaj, kvankam ĝi ne pli veras ol la mirakloj de Mahometo.

Ŝajnis al li, ke tia epizodo plej konformas al lia nuna stato, do kun grandaj elmontroj de intensa doloro ruliĝis sur la grundo, ripetante per febla voĉo kion laŭdire iam diris la vundita Kavaliro de la Arbaro:

—Kial vi min ne priploras,
mia kara sinjorin'?
Mian sorton vi ne konas,
aŭ vi, falsa, trompas min.

Kaj tiel li daŭrigis la romancon ĝis:

Ho, nobla markiz' de Mantua,
mia onklo kaj sinjor'!

Bonŝance okazis, ke, kiam li atingis ĉi verson, iu kampulo, najbaro lia en lia vilaĝo, revenante de muelejo, kien li antaŭe portis ŝarĝon da tritiko, vidis la kuŝanton, proksimiĝis, demandis, kiu li estas, kaj kio doloras lin, ke tiel triste li plendas. Don Quijote certe kredis, ke lin alparolis la markizo de Mantua, lia onklo, do kiel respondon, li daŭrigis

la deklamon de la romanco sciigante pri sia misfortuno kaj pri la am-impliko de la filo de la Imperiestro kun sia edzino, same kiel la romanco tekstas.

La kampulo, mirante je tiaj absurdoj, demetis de li la vizieron, tute frakasitan pro la batado, komencis viŝi al li la vizaĝon plenan de polvo, kaj, apenaŭ li finis, li rekonis nian hidalgon kaj diris:

—Sinjoro Quijada —tiel li certe nomiĝis, antaŭ ol li perdis la saĝon, kiam li ankoraŭ ne ŝanĝiĝis de kvieta hidalgo en vagantan kavaliron—. Kiu faris el vi tian kaĉon?

Sed al ĉiu demando don Quijote respondis deklamante la romancon, do la bona kampulo demetis de li la platojn de la brusto kaj la dorso, por vidi, ĉu li havas ian vundon, sed li rimarkis nek sangon nek signon de difekto. Li provis starigi lin, kaj post ne eta peno sukcesis meti lin sur sian azenon, kiu ŝajnis pli trankvila rajdbesto. Poste li prenis la armilojn, eĉ la splitojn de la lanco, kunligis ilin sur Rocinante, prenis ties bridon kaj la kondukilojn de la azeno kaj sin direktis al la vilaĝo, afliktite pro la absurda galimatia de don Quijote; ne malpli afliktite iris nia hidalgo, pistita kaj plena de kontuzoj, tiel, ke li povis apenaŭ teni sin sur la azeno; de tempo al tempo li forte veis, tiamaniere, ke liaj lamentoj atingis la ĉielon, kaj la kampulo ne povis ne demandi lin, kian doloron li sentas.

Vere ŝajnas, ke la propra diablo metis al li en la kapon historiojn konformajn al lia misfortuno, ĉar, forgesinte en tiu momento Balduenon, li memoris la maŭron Abindarráez en la sceno, kie la alkado de Antequera, Rodrigo de Narváez, arestas kaj enŝlosas lin en la fortreso. Tiel do, kiam la kampulo redemandis, kiel li fartas kaj kion li sentas, don Quijote respondis per la samaj vortoj kaj rezonoj, kiujn la enfermita arabo diris al Rodrigo de Narváez en la libro *Diana*

de Jorge de Montemayor. Tiel kaj tiom nia hidalgo aplikis ilin al si, ke la kampulo koleris kiel cent diabloj, ĉar li devis aŭdi tiel densan kaskadon da stultaĵoj. Konkludante per ĉio ĉi, ke lia najbaro frenezas, la kampulo akcelis la marŝon, ĉar li deziris plej baldaŭ alveni al la vilaĝo, por ne plu aŭdi la tedan litanion de don Quijote, kiu fine diris:

—Sciu via moŝto, sinjoro don Rodrigo de Narváez, ke ĉi bela Jarifa ĵus menciita estas nun la linda Dulcinea de El Toboso, je kies honoro mi faris, faras kaj faros la plej famajn prodaĵojn, kiujn oni vidis, vidas kaj vidos en la mondo.

Ĉe tio respondis la kampulo:

—Vidu, via moŝto, ke mi, povra pekulo, estas nek don Rodrigo de Narváez, nek la markizo de Mantua, sed Pero Alonso, via najbaro; kaj via moŝto estas nek Baldueno, nek Abindarráez, sed la honora hidalgo sinjoro Quijada.

—Mi scias, kiu mi estas —respondis don Quijote—, kaj scias ankaŭ, ke mi povas personigi, ne nur la homojn antaŭe menciitajn, sed la dek du parulojn de Francujo kaj eĉ la naŭ grandulojn de la Famo, ĉar miaj faroj superos ĉion, kion ili unuope kaj are plenumis.

En tia kaj similaj konversacioj ili alvenis al la rando de la vilaĝo ĉe la falo de la nokto; sed la kampulo atendis la plenan noktigon, por ke neniu vidu la disbatitan hidalgon tiel senlora rajdanto. Do en la, laŭ sia bontrovo, konvena momento, li eniris en la vilaĝon kaj en la domon de don Quijote, kie regis forta ekscito. Tie troviĝis la pastro kaj la barbiro, grandaj amikoj de don Quijote, kaj la mastrumantino krie diris al ili en tiu momento:

—Kion vi opinias, sinjoro licenciulo Pero Pérez —tiel nomiĝis la pastro—, pri la misfortuno de nia sinjoro? Jam de tri tagoj mankas li, la ĉevalo, la ŝildo, la lanco kaj la armaĵo. Ve kaj

ve! Estas certe kiel tio, ke mi naskiĝis por morti, ke la damnindaj libroj kavaliraj, kiujn li havas kaj legadas, renversis al li la cerbon; nun mi memoras, ke mi ofte aŭdis lin murmuri al si, ke li volas fariĝi vaganta kavaliro kaj iri serĉi aventurojn en la vasta mondo. Satano kaj Barabaso prenu la librojn, kiuj tiel ruinigis la plej delikatan intelekton troveblan en La Mancha.

La nevino diris la samon kaj eĉ pli:

—Sciu, sinjoro majstro Nicolás —tiel nomiĝis la barbiro—, ke okazis, ke mia sinjoro onklo legadis en tiuj perversaj libroj de misaventuroj ofte dum du sinsekvaj tagoj kun ties noktoj, kaj ĉe la fino, li forpuŝis la libron, eltiris la glavon, atakis hake pike la murojn, kaj jam konsumita de laco, diris, ke li mortigis kvar gigantojn, grandajn kiel kvar turoj, kaj ke lia ŝvito estas sango de la vundoj ricevitaj en la batalo. Poste li trinkis grandan kruĉon da frida akvo kaj sidis jam trankvila kaj freŝa, dirante, ke ĝi estas rara likvaĵo, kiun alportis al li la saĝa Esquife, granda sorĉisto kaj amiko lia. Sed mi havas la tutan kulpon, ĉar mi ne informis vin pri la ekstravagancoj de mia sinjoro kaj onklo, kaj tial vi povis nek sanigi lin, antaŭ ol li falis en tian ekstremon, nek meti en la fajron tiel pekajn librojn; vere, multaj el ili meritas bruli, kiel la herezaj.

—Tion saman mi opinias —diris la pastro—, kaj mi ĵuras, ke morgaŭ ne pasos, sen ke oni kondamnu ilin al fajro en publika aŭtodafeo. Tiel ili ne havos la ŝancon igi, ke aliaj legantoj faru kion certe faris nia bona amiko.

Ĉion ĉi subaŭskultis don Quijote kaj la kampulo; ĉi lasta fine komprenis, kia estas la malsano de lia najbaro, kaj komencis krii:

—Viaj moŝtoj apertu la pordon al sinjoro Balduino kaj al sinjoro markizo de Mantua, grave vundita, kaj al sinjoro

maŭro Abindarráez kun ties kaptito, la kuraĝa Rodrigo de Narváez, alkado de Antequera.

Aŭdinte tiajn voĉojn, ĉiuj eliris; la viroj rekonis la amikon, la virinoj la mastron kaj onklon, rajdantan ankoraŭ sur la azeno, ĉar li ne kapablis desalti, kaj ĉiuj alkuris lin brakumi. Li diris:

—Haltu la tuta mondo. Mi venas grave vundita pro la kulpo de mia ĉevalo. Portu min al la lito kaj, se eble, voku la saĝan Urganda, ke ŝi ekzameni kaj kuracu al mi la vundojn.

—Rigardu, kiel malfeliĉe! —interrompis la mastrumantino—. Senerare diris al mi la koro, kia muŝo zumas en lia kapo! Supren iru, sinjoro, ke ni scios kuraci vinsen la interveno de via Ungata. Malbenon cent fojojn al la kavaliraj libroj, kiuj faris tian damaĝon al via moŝto!

Oni portis lin al la lito, ekzamenis lin kaj trovis nenian vundon. Li diris, ke li suferas nur ĝeneralan trabatiĝon, ĉar li falegis kun Rocinante, sia ĉevalo, batalante kontraŭ dek gigantoj, la plej monstraj kaj aŭdacaj troveblaj en granda parto de la tero.

—Ĉu vere? —diris la pastro—. Ĉu gigantoj en la danco? Per la signo de la kruco mi ĵuras, ke morgaŭ, antaŭ la noktiĝo, ĉiu el ili forbrulos.

Oni faris al don Quijote senĉesajn demandojn, sed li respondis nur, ke li volas manĝi kaj dormi, ke li plej bezonas tion. Oni kontentigis lian deziron, la pastro demandis al la kampulo detalojn, pri kiel li renkontis don Quijote, kaj Pero Alonso respondis informante pri ĉio, inkluzive pri la absurdaj monologoj de don Quijote dum li kuŝis sur la grundo kaj dum li rajdis sur la azeno hejmen. Tio firmigis la decidon de la pastro fari kion li faris la sekvantan tagon: iri voki sian

amikon la barbiron, majstro Nicolás, kaj, kun li, —viziti la hidalgon en ties domo.

Ĉapitro 6

Pri la granda kaj amuza elsarko, kiun la pastro kaj la barbiro faris el inter la libroj de nia inĝenia hidalgo

Don Quijote dormis ankoraŭ. La pastro petis de lia nevino la ŝlosilon de la ĉambro, kie sidis la libroj kaŭzintaj la damaĝon, kaj ŝi tre volonte ĝin transdonis. Ĉiuj eniris, ankaŭ la mastrumantino, kaj trovis pli ol cent volumojn grandajn tre bone binditajn, kaj ankaŭ kelkajn etajn. Vidinte ilin, la mastrumantino tuj eliris kaj revenis iom poste kun bovlo da sankta akvo kaj kun aspergilo, kaj diris:

—Prenu, sinjoro licenciulo. Aspergu la ĉambron por ke, se okaze troviĝas ĉi tie kelkaj el la multaj sorĉistoj de la libroj, ili ne ensorĉu nin repune kontraŭ tio, ke ni volas ilin pune elmondigi.

La licenciulo ridis je la simpleco de la mastrumantino kaj petis la barbiron transdoni al li la librojn, unu post alia, por vidi, pri kio ili temas; ĉar povus okazi, ke kelkaj ne meritus la punon je fajro.

—Ne —diris la nevino—. Nenian pardonon; ili ĉiuj kulpas. Prefere ĵeti ilin tra la fenestroj al la korto por amasa bruligo; aŭ porti ilin al la kralo^[51] kaj fari tie la fajron, kie la fumo ne ĝenus.

La mastrumantino havis la saman opinion: tiel multe deziris la du virinoj la morton de la senpekaj libroj. Tamen la pastro ne konsentis tion, sen legi almenaŭ la titolojn. La unua volumo, kiun majstro Nicolás transdonis al li estis *La kvar libroj de Amadís de Gaŭlio*.

—Jen io kurioza —diris la pastro—. Laŭdire ĉi libro estas la unua kavalirtema presita en Hispanujo, kaj la ceteraj havas en ĝi sian originon, do, ĉar ĝi iniciatis tiel malignan sekton, ni senindulge kondamnu ĝin al la fajro.

—Ne, sinjoro —diris la barbiro —ĉar mi aŭdis ankaŭ, ke ĝi elstaras kiel la plej bona libro kavalira iam verkita, sekve ni devus indulgi ĝin pro ties unika valoro.

—Vi pravas —diris la pastro—, tial ni respektos ĝian vivon. Almenaŭ nune. Ni vidu la alian apudan libron.

—Temas pri *La faroj de Esplandián*, leĝa ido de *Amadís de Gaŭlio*.

—Sed la boneco de la patro ne estas kaŭzo, ke ni savu la filon. Prenu, sinjorino, apertu tiun fenestron kaj ĵetu la libron al la fajro. Ĝi estu la unua ero de la brulonta amaso.

La mastrumantino obeis kun granda kontento, kaj la bona Esplandián flugis ĝis la kralo por pacience atendi tie, ke la flamoj ĝin konsumu.

—Daŭrigu —diris la pastro.

—La jena —informis la barbiro— estas *Amadís de Grekujo*. Mi kredas, ke ĉiuj libroj ĉi-flankaj temas pri la diversaj Amadís.

—Do, senescepte al la kralo —diris la pastro—. Por la plezuro bruligi la reĝinon Pintiquiniestra, la paŝtiston Darinel kaj ties eklogojn, kaj la diable torditajn rezonojn de la aŭtoro, mi bruligus kun ili eĉ mian propran patron, se ankaŭ li vagus kiel armita kavaliro.

—Mi opinias la samon —diris la barbiro.

—Kaj eĉ mi —aldonis la nevino.

—Se tiel, antaŭen —diris la mastrumantino—, la kralo ilin atendas.

Oni transdonis al ŝi grandan kvanton da libroj, kaj la virino, por ŝpari al si la ŝtuparon, ĵetis ilin tra la fenestro.

—Kiu estas tiu barele granda? —diris la pastro.

—*Don Olivante de Laura* —respondis la barbiro.

—Ties aŭtoro —diris la pastro— verkis ankaŭ *Ĝardeno de floroj*, kaj vere mi ne scias, kiu el la du libroj estas pli vera, aŭ, se paroli ĝuste, malpli mensoga. Mi diru nur, ke pro sia stulto kaj aroganto don Olivante pereos en la kralo.

—Prenu la sekvantan: *Florismarte de Hirkanio* —diris la barbiro.

—Ĉu aperas ankaŭ sinjoro Florismarte? —respondis la pastro —. Mi ĵuras, ke li tuj vizitos la kralon, malgraŭ la strangaj cirkonstancoj de sia naskiĝo kaj siaj fantastaj aventuroj; nenion pli bonan meritas la seko kaj duro de ĝia stilo. Ĝin elĵetu kaj ankaŭ ĉi alian libron, sinjorino.

—Tre volonte, mia sinjoro —respondis la mastrumantino kaj ĝoje plenumis la ordonon.

—Jen *La kavaliro Platir* —diris la barbiro.

—Antikva libro —komentis la pastro—. Nenion indulgeblan oni trovas en ĝi. Ĝi akompanu la aliajn.

Tio efektiviĝis, kaj oni apertis alian libron por vidi la titolon: *La kavaliro de la kruco*.

—Pro tiel sankta titolo oni inklinus ignori la stulton de la libro. Sed oni diras, ke post la kruco embuskas la demono.

Do ĝi ricevu la fajron.

La barbiro prenis alian libron kaj diris:

—Jen *Spegulo de kavaliraĵoj*.

—Mi bone konas ĝin —diris la pastro—. En ĝi rolas sinjoro Reinaldos de Montalbán kun siaj amikoj kaj kompanoj, pli ŝtelemaj ol Kako, kaj la dek du paruloj de Francujo kun la verfidela historiisto Turpín; mi emas kondamni ilin nur al konstanta ekzilo, konsiderante, ke ili parte inspiris la faman Mateo Boyardo, kaj ke de ĉi lasta ŝpinis sian ŝtofon la kristana poeto Ludovico Ariosto, kiun mi ne respektos, se mi trovos lin ĉi tie parolanta en alia lingvo diferenca de la lia; sed se li esprimas sin itale, mi lin alpremos al mia koro.

—Mi havas lian libron en la itala —diris la barbiro— sed ne komprenas ĝin.

—Despli bone, ke vi ne komprenas^[52] —respondis la pastro—. Kaj nenion oni perdus, se la sinjoro kapitano^[53] ne estus farinta lin kastiliano, ĉar tiel li prenis de li grandan parton de ties origina valoro. Al la sama rezulto venas ĉiuj tradukantoj de versoj, ĉar, kiom ajn zorge kaj kompetente ili laboras, neniam ili sukcesas redoni plene la esencon de la originaloj. Do ĉi libron kaj la ceterajn pri aferoj de Francujo, se tiajn ni trovos ĉi tie, ni apartigu kaj metu en sekan puton, ĝis ni fine decidus ilian definitivitan sorton. Oni esceptu *Bernardo del Carpio*, kiu, mi scias, troviĝas ie ajn ĉi tie kaj alian titolitan *Roncesvalles*. Kiam ilin mi trafos, ili iros rekte en la manojn de la mastrumantino, kaj de la ŝiaj senkompate en la fajron.

La barbiro aprobis ĉion ĉi kaj rigardis bonaj kaj ĝustaj tiajn opiniojn. Li tute certis, ke la pastro estas tiel bona kristano kaj amiko de la vero, ke nenial li kapablus diri mensogon. La barbiro apertis alian libron, vidis, ke temas pri *Palmerín de*

Oliva, kaj ke apud ĝi sidas la titolita *Palmerín de Anglujo*.
Observinte ilin, diris la licenciulo:

—La olivon oni pistu kaj bruligu, kaj eĉ ne ties cindro restu, sed la palmon de Anglujo oni gardu kaj konservu kiel unikaĵon, kaj oni faru por ĝi skatolon, kian trovis Aleksandro inter la trezoroj postlasitaj de Dario, kaj destinis enteni la verkojn de Homero. *Palmerín de Anglujo* respektindas pro du motivoj: unue, ĝi tre bonas per si mem; due ĝin verkis, laŭ la famo, iu sprita reĝo de Portugalujo. La aventuroj en la kastelo de Miraguarda estas bonegaj kaj lerte elpensitaj; la dialogoj, ĝentilaj kaj klaraj, spegulas dece kaj vere la karakteron de ĉiu parolanto. Do mi diras, majstro Nicolás, ke, se vi ne havas kontraŭan opinion, ĉi libro kaj *Amadís de Gaŭlio* saviĝu de la fajro; kaj la ceteraj, sen pliaj esploroj, pereu.

—Ne, amiko mia —respondis la barbiro—, ĉar jen mi havas ĉi tie la faman *Don Belianís*.

—Li —diris la pastro— kaj ankaŭ la dua, tria kaj kvara partoj de la libro bezonas iom da rabarbo por evakui el si sian troan galon. Same necesas, ke oni elprenu la parton pri la kastelo de la Famo kaj aliajn pli gravajn impertinentojn. Do ni allasos al ili sufiĉan tempon, ke ili sin korektu, kaj se efektive ili montros ian pliboniĝon, ni traktos ilin aŭ juste aŭ mizerikorde; dume tenu ilin en via hejmo, sed zorgu, ke aliaj homoj ne legu ilin.

—Tre volonte —respondis la barbiro.

La pastro ne volis plu laciĝi legante la titolojn, do ordonis la mastrumantinon preni la librojn grandajn kaj ĵeti ilin ĉiujn al la kralo. La ordono trafis ne surdan orelon, sed virinon, kiu deziregis bruligi la librojn, eĉ pli ol akiri al si plej grandan kaj fajnan ŝtofon, do prenante ok volumojn per unu fojo, ŝi ilin

ĝetis tra la fenestro. Ĉar ŝi ĉirkaŭprenis tiel multajn samtempe, unu elfalis ĉe la piedojn de la barbiro, li volis scii ĝian titolon kaj legis: *Historio de la fama kavaliro Tirante el Blanco*.

—Dio laŭdatu! —laŭte ekkriis la pastro—. Tirante el Blanco ĉi tie! Donu ĝin al mi, amiko, ĉar mi konsideras, ke mi trovis trezoron da plezuro kaj minon da distro. Tie troveblas Kirieleisón de Montalbán, kuraĝa kavaliro; lia frato Tomás de Montalbán; la kavaliro Fonseca; la batalo de la kuraĝa Tirante kontraŭ la hundo; la spritaĵoj de la pucelo Placerdemivida; la amoj kaj mensogoj de la vidvino Reposada; ŝia moŝto la imperiestrino, kiu enamiĝis al sia ŝildisto Hipólito... Vere, amiko, en ĉi libro, laŭstile la plej bona en la mondo, la kavaliroj manĝas, dormas, forpasas en la lito kaj testamentas ĉe la horo de la morto. Krome okazas en ĝi multo alia, kiu mankas en la ceteraj libroj kavaliraj. Tamen ĝia aŭtoro meritas vivodaŭran punon je galeroj, ĉar li ne helpis sin per la stultaĵoj propraj al tiaj libroj.^[54] Prenu ĝin hejmen, legu ĝin kaj vi vidos, ke mi diras al vi la veron.

—Kun plezuro —respondis la barbiro—, sed kion ni faros el la ĉi restantaj libretoj?

—Ili certe estas ne kavaliraj, sed poeziaj —diris la pastro.

Li apertis unu, vidis ĝian titolon *La Diana*, de Jorge de Montemayor, supozis, ke la ceteraj estas de la sama speco, kaj diris:

—Ili ne meritas bruli, kiel la aliaj, ĉar ili nek faras nek faros tiom da damaĝo kiom la kavaliraj libroj. Temas pri verkoj sane distraj, kaj de ili oni ricevas nenian damaĝon.

—Ve, mia sinjoro! —diris la nevino—. Via moŝto devus ordoni bruligi ankaŭ ilin, ĉar, se mia sinjoro onklo resaniĝos de la

kavalirisma malsano, ekzistas la danĝero, ke, se li legos la poemojn, li kapricos tiam fariĝi paŝtisto kaj vagadi tra arbaroj kaj herbejoj kantante kaj ŝalmante, aŭ, eĉ pli mave, fariĝi poeto, kio laŭdire estas afekcio senrimeda kaj kontaĝa.

—Ĉi pucelo pravas —diris la pastro— kaj konvenas apartigi de la vojo de nia amiko eventualan ŝtonon de falpuŝiĝo. Kaj ĉar ni komencis per *La Diana* de Montemayor, ŝajnas al mi, ke ĝi ne devas bruli, kaj ke prefere oni elprenu el ĝi ĉion pri la sorĉistino Felicia kaj la magia akvo, preskaŭ ĉiujn versojn maĵorajn,^[55] tiel, ke nur restu al ĝi la prozo kaj la honoro esti la unua inter la libroj de ĝia speco.

Ĉi sekvanta —diris la barbiro— estas *La Diana* nomata *dua*, verkita de El Salmantino, kaj jen ankoraŭ alia kun la sama titolo, kiun verkis Gil Polo.

—*La Diana* de El Salmantino —respondis la pastro— akompanu en la kralo la kreskantan nombron da kondamnitaj, kaj tiun de Gil Polo oni konservu, kvazaŭ Apolono mem estus ĝin verkinta. Kaj ni rapidu, amiko, ĉar jam estas iom tarde.

—Ĉi volumo —diris la barbiro— havas la titolon *La dek libroj pri la fortune de amo*, kaj ĝin verkis Antonio de Lofraso, poeto sarda.

—Mi firme asertas, je miaj ordinoj —diris la pastro—, ke, de kiam Apolono estas Apolono, la muzoj, muzoj, kaj la poetoj, poetoj, ne ekzistas libro tiel humura kaj sensenca. En sia speco ĝi rangas kiel plej bona kaj unika en la mondo, kaj, kiu ne legis ĝin, devas kalkuli, ke li ne legis ankoraŭ ion vere ĉarman. Donu ĝin al mi, amiko, ĉar mi pli aprezas ĝin, ol se oni donacus al mi sutanon el Florenca serĝo.

Kun grandega kontento la pastro metis aparte la libron, kaj la barbiro daŭrigis:

—Nun jen *La paŝtisto de Iberia, Nimfoj de Henares* kaj *Sintrompoj de la ĵaluzo*.

—Sufiĉe —diris la pastro—. Ili iru al la sekulara brako de la mastrumantino. Kaj ne demandu al mi la kialon, aŭ ni neniam finos ĉi taskon.

—Nun venas *La paŝtisto de Filida*.

—Temas ne pri paŝtisto, sed pri tre saĝa kortegano. Gardu ĝin kiel juvelon —diris la pastro.

—Ĉi granda estas *Trezoro de diversaj poemoj*.

—Ili, ĉar tro multaj, ne tre plaĉas. Necesas elsarki el ĝi kelke da abomenindaĵoj kuŝantaj inter ĝiaj perloj. Gardu ĝin, ĉar ties aŭtoro estas amiko mia, kaj per tio ni montru nian respekton al aliaj pli inspiritaj kaj heroaj verkoj venintaj de lia plumo.

—Jen *Kanzonaro*, de López Maldonado —diris la barbiro.

—Ankaŭ ĝia aŭtoro estas granda amiko mia —respondis la pastro—. Li ravas per siaj versoj, kaj, kiam li ilin kantas, lia voĉo tiel dolĉas, ke ĝi ensorĉas. Liaj eklogoj iom tro longas, sed oni scias, ke da bono neniam estas multe. Gardu ĝin kun la aliaj elektitaj libroj. Sed kio sidas tie apude?

—*La Galatea*, de Miguel de Cervantes —diris la barbiro.

—Jam de multaj jaroj tiu Cervantes estas granda amiko mia, kaj mi scias, ke li havas pli da sperto kun la misfortuno ol kun la versoj. Lia libro posedas iom da bona inventemo, faras promesan komencon, sed finas nenion. Necesas atendi

la duan parton, kiun li anoncas. Se li sin korektos, eble li trovos la plenan mizerikordon, kiun oni rifuzas nun al li. Dume gardu ĝin kiel kaptiton ĉe vi.

—Volonte, amiko —respondis la barbiro—. Kaj jen tri kune: *La Araucana*, de don Alonso de Ercilla; *La Austriada*, de Juan Rufo, juĝisto en Córdoba, kaj *El Monserrate*, de Cristóbal de Virués, poeto valencia.

—La tri libroj —diris la pastro— estas la plej bonaj verkitaj en la hispana per maĵoraj versoj kaj povas konkuri kun la famegaj de Italujo. Gardu ilin kiel la plej riĉajn trezorojn da hispana poezio.

La pastro laciĝis vidi librojn kaj proponis ĵeti la ceteron al la fajro sen plia esploro; sed la barbiro apertis jam unu titolitan *La larmoj de Angélica*.

—Ilin mi verŝus —diris la pastro, aŭdinte la titolon— se tian libron konsumus la fajro, ĉar ĝin verkis unu el la famaj poetoj de la mondo,^[56] ne nur de Hispanujo, kaj ege eminenta ankaŭ kiel tradukanto de kelkaj fabloj de Ovidio.

[51] Vasta korto por agraj laboriloj kaj bestoj.

[52] La pastro tion preferas, pro la obscenaj partoj de *Orlando furioso*, la aludita verko.

[53] T.e. Jerónimo de Urrea, fuŝa tradukinto de *Orlando furioso*.

[54] La pastro parolas ironie, kvazaŭ li estus fervora leganto de fantastaj kavaliraĵoj kaj, kiel tia, li ĉagreniĝus pro la

manko, en *Tirante el Blanco*, de la kutimaj, kaj ŝatataj, absurdoj kaj ridindaĵoj.

[55] Havantaj pli ol ok silabojn.

[56] Luis Barahona de Soto, senglora poeto sed amiko de Cervantes. Nuntempe nur la eruditoj legas, aŭ studas, liajn verkojn.

Ĉapitro 7

Pri la dua eliro de nia bona kavaliro don Quijote de La Mancha

Ĉe tio don Quijote komencis plenvoĉe krii, dirante:

—Ĉi tie, kuraĝaj kavaliroj, ĉi tie necesas montri la forton de via sentima brako, ĉar la korteganoj^[57] gajne batalas en la turniro.

Oni ĉesigis la ekzamenon de la libroj por hasti al la tumulto, kaj tial probable iris al la flamoj, nevidate kaj neaŭdate, *La Carolea*, *Leono de Hispanujo* kaj la kronikoj pri la imperiestro, ĉi lasta kompilita de don Luis de Ávila. Certe ili troviĝis inter la ne ekzamenitaj libroj, kaj, se viditaj de la pastro, eble ili ne suferus tiel rigoran punon.

Kiam la grupo eniris en la ĉambron de don Quijote, li, kiu jam forlasis la liton, kriis ankoraŭ plenvoĉe kaj sence, dum tranĉe kaj retranĉe li svingis ĉien la glavon kun tiel fajraj okuloj, ke ŝajnis, ke li neniam antaŭe dormis. Ili ĉirkaŭprene retenis lin kaj lin perforte metis denove en la liton; kaj, kiam li iom kvietiĝis, li sin turnis al la pastro, kaj diris:

—Cetere, sinjoro ĉefepiskopo Turpín, estas hontinde, ke ni, la dek du paruloj de Francujo, permesas, ke la kortegaj kavaliroj proklamu sin senplie venkantoj en la turniro, malgraŭ ke ni, la aventuristoj, gajnis la premion de la tri lastaj tagoj.

—Trankviliĝu via moŝto —diris la pastro—, ĉar Dio bonvolos ŝanĝi la sorton tiel, ke la hodiaŭa perdo iĝos morgaŭa gajno.

Sed nune vi devas flegi vin. Vi ŝajnas, se ne grave vundita, almenaŭ tro konsumita.

—Vundita, ne —respondis don Quijote—. Trabatita kaj senforta, sendube, ĉar la bastardo don Roldán pistis min per la trunko de kverko, kaj tion li faris pro envio, ĉar li scias, ke laŭkuraĝe nur mi rivalas lin; sed oni ĉesu nomi min Reinaldos de Montalbán, se, kiam mi lasos la liton, mi ne igos lin pagi kare ĉion ĉi, spite lian magian povon; kaj nun donu al mi manĝon, ĉar ĝin mi plej bezonas. Pri la venĝo mi mem zorgos.

Laŭ lia peto, oni alportis al li manĝon, poste li denove endormiĝis, kaj la aliaj ree miris pri lia frenezo. Tiun nokton la mastrumantino bruligis ĝiscindre la librojn de la kralo kaj de la tuta domo, kaj sendube same ardis kelkaj volumoj, indaj esti konservataj en eternaj arĥivoj, sed ilin domaĝi ne volis la sorto nek la pigro de la ekzamenintoj, kaj tiamaniere pruviĝis la sentenco, ke la senpekaj pagas por la kulpaj.

La pastro kaj la barbiro klopodis kuraci la malsanon de sia amiko, kaj unu el iliaj rimedoj konsistis en tio: igi masonfermi la libro-ĉambron, por ke, kiam don Quijote ellitiĝos, li ne trovu la volumojn (sen la kaŭzo eble ĉesus la efiko), kaj diri al li, ke sorĉisto forportis kun si la librojn kaj eĉ la ĉambron.

Oni rapide tion faris, kaj kiam don Quijote ellitiĝis du tagojn poste, li sin direktis al siaj libroj, kaj, ĉar li ne trovis la ĉambron, li iris tien kaj tien, serĉante ĝin. Li paŝis ĝis la loko, kie la pordo antaŭe staris, palpis la muron per la manoj kaj turnis kaj returnis la okulojn ĉien, sen diri eĉ unu vorton. Sed fine li demandis al sia mastrumantino, en kiu flanko troviĝas la libroĉambro, kaj ŝi, bone lerninta kian respondon doni, diris:

—Ĉambro? Kiu ĉambro? Jam ne ekzistas ĉambro nek libroj en ĉi domo, ĉar ĉion forportis la diablo mem.

—La diablo ne —intervenis la nevino—, sed sorĉisto veninta sur nubo la sekvantan nokton post via foriro. Li desaltis de drako, eniris en la ĉambron, kaj mi ne scias kion li faris tie, ĉar iom poste li forflugis tra la tegmento, lasante la domon plenan de fumo; kiam ni iris rigardi, ni vidis eĉ ne unu libron, nek signon de la ĉambro. Ni tre bone memoras nur, mi kaj la mastrumantino, ke, ĉe sia forflugo, la malica oldulo diris plenvoĉe, ke ni poste vidus, kian damaĝon li faris en la domo pro sia sekreta rivaleco kun la mastro de la libroj kaj de la ĉambro; li diris ankaŭ, ke li nomiĝas la sorĉisto Muñatón.

—Certe li diris Frestón —interrompis don Quijote.

—Mi ne scias, ĉu Frestón aŭ Fritón; nur, ke ĝi finiĝas per «tón» —respondis la mastrumantino.

—Efektive —diris don Quijote— temas pri klera sorĉisto, granda kontraŭulo mia, kaj li malicas al mi, ĉar li scias per siaj artoj kaj magioj, ke siatempe mi devos batali en persona duelo, kaj nepre venkos, kavaliron, kiun li favoras. Li scias, ke li ne povos eviti mian triumfon, kaj tial li klopodas ĉiamaniere plagi min. Sed mi diras al li, ke vanas spiti la volon de la ĉielo.

—Certe, mia sinjoro onklo —diris la nevino—, sed, kial vi implikiĝas en tiajn kverelojn? Ĉu ne pli bone resti pace hejme, anstataŭ vagi tra la mondo serĉante kion ne valoras renkonti, kaj ignorante, ke multaj iras tondi kaj revenas tonditaj?

—Ho nevino mia! —respondis don Quijote—. Kiel erare vi faras viajn kontojn! Oni provu tondi min, kaj mi deŝiros la

barbon de la provantoj, antaŭ ol ili sukcesos tuŝi al mi eĉ la pinton de unu sola haro!

La virino ne volis jam respondi, ĉar li komencis bruli de kolero. Nu, okazis, ke li restis ĉe si dek kvin tagojn tre kviete, montrante nenian signon, ke li deziras ripeti la unuajn ekstravagancojn, kaj tenante amuzegajn disputojn kun siaj amikoj la pastro kaj la barbiro; li insistis, ke la mondo pleje bezonas vagantajn kavalirojn, kaj ke, per li, reviviĝos la kavalirismo. La pastro foje kontraŭdiris, foje konsentis, ĉar, se li ne uzus tian ruzon, li ne povus plu rilati kun li.

Tiutempe don Quijote klopodadis gajni al si najbaran kampulon, riĉan je boneco (se oni povas nomi malriĉulon riĉa)^[58] sed kun nur iometo da cerbo en la kapo. Don Quijote tiel insistis kaj promesis, ke la povra kampulo fine konsentis iri kun li kiel ŝildisto. Don Quijote diris al li interalie, ke li akompanu lin kun ĝoja koro, ĉar povus okazi, ke, pere de ajna aventuro, li, don Quijote, povus senplie gajni insulon kaj nomi lin ties gubernatoro. Konvinkite de tia promeso kaj aliaj similaj, Sancho Panza (tiel li nomiĝis) lasis siajn edzinon kaj filojn kaj dungiĝis al don Quijote.

Nia hidalgo okupiĝis poste, havigante al si monon; foje vendante ion, foje lombardante tion, ĉiuokaze subpreze ĉion cedante, li kolektis sufiĉan sumon. Li petis de amiko, kaj ricevis, rondan ŝildon,^[59] kaj, flikinte, kiel li povis, sian frakasitan kaskon, sciigis al sia ŝildisto Sancho la tagon kaj la horon de ilia proksima eliro, por ke li anticipu sin ekipu per ĉio necesa; don Quijote speciale rekomendis lin porti dusakon. Sancho respondis, ke tion li faros, kaj ke li portos ankaŭ sian bonegan azenon, ĉar longe piediri lacigas lin.

La mencion pri la azeno igis don Quijote mediti, ĉu ajna vaganta kavaliro iam havis ŝildiston surazene rajdantan, sed neniun tian kazon li povis memori; tamen li permesis lin

porti la azenon, kvankam li havis la intencon provizi lin per pli deca rajdobesto, kaj tiacele li pensis forpreni, post duelo, la ĉevalon de la unua insolenta kavaliro renkontota. Don Quijote ekipis sin per ĉemizoj kaj, kiom li povis, per ĉio alia, konforme al la konsiloj de la gastejestro.

Ĉion aranĝinte kaj pretiginte, sen adiaŭi Sancho Panza siajn edzinon kaj filojn, kaj don Quijote siajn nevinon kaj mastrumantinon, ili eliris nevidate el la vilaĝo iun nokton, kaj tiel longe ili rajdis, ke ĉe la tagiĝo ili certis, ke, se okaze serĉataj, ili estus netroveblaj.

Sancho Panza rajdis kiel patriarko sur la azeno, kun sia dusako kaj sia boto,^[60] kaj kun la granda deziro baldaŭ vidi sin gubernatoro de la promesita insulo. Okazis, ke don Quijote hazarde prenis kaj sekvis la saman vojon de la unua vojaĝo, t.e. tra la kampoj de Montiel, kaj li sentis sin ne tiel malkomforte kiel la pasintan fojon, ĉar en tiel frua horo la suno, trafante ilin oblikve, ne tro ĝenis. Sancho Panza diris nun al sia mastro:

—Ne forgesu via moŝto kion vi promesis al mi pri la insulo, ke mi scios ĝin regi, kiom ajn granda ĝi estas.

—Sciu, amiko Sancho Panza —respondis don Quijote—, ke la antikvaj vagantaj kavaliroj kutimis fari siajn ŝildistojn gubernatoroj de insuloj kaj regnoj, kies teritorion ili konkeris. Mi havas ne nur la firman intencon teni min al tiel dankelmontra moro, sed eĉ pli grandanime rilati al ĝi, ĉar kelkfoje, eble preskaŭ ĉiuokaze, la antikvaj kavaliroj atendis ĝis liaj ŝildistoj oldiĝis, kaj nur tiam, jam pli ol sataj servadi kaj suferi la rigoron de mizeraj tagoj kaj eĉ pli mizeraj noktoj, ili ricevis la titolon de grafo, aŭ maksimume de markizo, de ia signifa valo aŭ provinco. Sed, se ni ambaŭ vivos, eble de nun ĝis ses tagoj mi povos gajni al mi regnon kun dependaj teritorioj, plej konvenaj por ke mi kronu vin

reĝo de unu el ili. Ne rigardu tion troa, ĉar al kazoj kaj okazoj tiel eksterordinaraj kaj neimageblaj frontas la kavaliroj, ke mi povos facile doni al vi eĉ pli ol mi promesas.

—Tiel do —respondis Sancho Panza—, se pro unu el la mirakloj, pri kiuj vi ĵus parolis, mi fariĝos reĝo, mia edzino Juana Gutiérrez estos almenaŭ reĝino, kaj miaj filoj, infantoj.

—Tute certe, kaj ne dubu —respondis don Quijote.

—Tamen mi dubas —diris Sancho Panza—, ĉar mi kredas, ke eĉ se Dio pluvigus kronojn, neniu el ili bone sidus sur la kapon de Mari Gutiérrez. Sciu, sinjoro, ke ŝi, kiel reĝino, ne valorus eĉ du maravedojn. La rango de grafino pli konvenas al ŝi, kaj tio, nur se Dio helpas.

—Dio mem decidu —respondis don Quijote— kaj Li donu al ŝi tion, kio plej al ŝi konvenas. Sed vi ne humiliĝu, ĝis la ekstremo kontentiĝi je io sub la rango de provincestro.

—Tute ne, sinjoro —respondis Sancho—, des pli, ke mi havas tiel grandan mastron, kaj vi scios doni al mi ion konforman al miaj kapabloj.

[57] Ekzistis du specoj de kavaliroj: korteganoj aŭ ne vagantaj, kaj aventuristoj aŭ vagantaj.

[58] Alia ebla traduko: «homon honestan (se oni povas nomi malriĉulon honesta)». Cervantes ludas per la du signifoj de la hispana «hombre de bien»: «honesto, bona homo» kaj «riĉa homo».

[59] Certe la unua ŝildo de don Quijote perdiĝis aŭ neripareble rompiĝis. Ŝildojn rondajn portis nur la surpiedaj

batalantoj, do la rajdanta figuro de don Quijote vidiĝis des pli groteska kun tiel malkongrua ŝildo.

[60] Neologismo. Hispane «bota». Tipe hispana, manportebla fel-saketo por vino, el kie oni senpere trinkas. Ĝia formo iom similas la formon de la porpieda boto.

Ĉapitro 8

Pri la brava faro de la kuraĝa don Quijote en la terura kaj neniel imagebla aventuro de la vento-muelejoj, kun aliaj eventoj memorindaj

Ĉe tio ili distingis tridek aŭ kvardek vento-muelejojn, kiuj staras sur la kampoj de Montiel, kaj, ilin vidante, don Quijote diris al sia ŝildisto:

—La fortune gvidas niajn paŝojn, eĉ pli bone ol ni dezirus, ĉar vidu, amiko Sancho, tie aperas tridek kaj kelkaj monstraj gigantoj. Mi pensas ilin ataki kaj mortigi, kaj ni komencos riĉiĝi per tio, kion ni prenos de ili. Ni faras justan militon kaj grandan servon al Dio ekstermante tiel malignan rason de sur la surfaco de la tero.

—Kiu gigantoj? —demandis Sancho.

—Jen ili, tie for —respondis lia mastro— kun la longaj brakoj. Okazas, ke ekzistas tiaj gigantoj kun brakoj preskaŭ ses mejlojn longaj.

—Atentu via moŝto —diris Sancho—. Tie aperas ne gigantoj, sed vento-muelejoj, kaj kio ŝajnas brakoj, tio estas la aloj, kiuj, kiam turnataj de la vento, irigas la muel-ŝtonon.

—Oni klare vidas —respondis don Quijote—, ke mankas al vi sperto pri aventuroj. Gigantoj ili estas, kaj, se vi timas, retiriĝu kaj preĝu, dum mi alfrontas ilin en feroca kaj danĝer-plena batalo.

Tion dirinte, li spronis la ĉevalon kaj ignoris la kriojn de la ŝildisto Sancho, kiu avertis lin, ke li iras ataki ne gigantojn,

sed vento-muelejojn. Sed tiel certis don Quijote, ke temas pri gigantoj, ke li nek aŭdis la kriadon de Sancho, nek konsciis pri kio efektive ili estas, kvankam li jam tre proksimis al ili. Kontraŭe, li avancis dirante plenvoĉe:

—Ne fuĝu, kovardaj kaj mizeraj monstroj, nur unu kavaliro vin atakas.

Tiam ekblovis iom da vento, la grandaj aloj komencis moviĝi, kaj ĉe tio don Quijote diris:

—Vi pagos al mi kare, eĉ se vi svingos pli da brakoj ol la giganto Briareo.

Tiel parolinte, li tutkore konfidis sin al sia sinjorino Dulcinea, petis ŝian helpon en tiel danĝera situacio, bone sin ŝirmis per la ŝildo, metis horizontalen la lancon, impetis antaŭen per la pleja galopo de Rocinante, atakis la fronte starantan muelejon, enpuŝis la lancon en la alon, kaj la vento turnis tiun tiel furioze, ke la lanco peciĝis trenante post si la ĉevalon kaj la rajdanton. Don Quijote, forte kontuzita, ruliĝis sur la grundo, Sancho Panza per la pleja rapido de sia azeno alkuris lin helpi, kaj, alvenante, vidis, ke lia mastro ne povas moviĝi: tian bategon ricevis li kaj la ĉevalo.

—Ho Dio! —diris Sancho—. Ĉu mi ne diris al via moŝto, ke vi zorgu kaj atentu, ke temas pri vento-muelejoj, kaj ke nur vento-kapuloj povus tion pretervidi?

—Silentu, amiko Sancho —respondis don Quijote—, kaj sciu, ke la aferoj de la milito, pli ol aliaj, estas objekto de konstanta ŝanĝo. Krome mi pensas, kaj estas la vero, ke la sama sorĉisto Frestón, la ŝtelinto de miaj ĉambro kaj libroj, turnis ĉi gigantojn en muelejojn, por rabi de mi la gloron de mia triumfo: tian malamikecon li tenas kontraŭ mi. Sed finfine lia nigra arto ne sukcesos vanigi la efikon de mia glavo.

—La volo de Dio plenumiĝu —respondis Sancho Panza, helpante sian mastron levi sin kaj sin sidigi sur la duonfrakturitan Rocinante.

Parolante pri ĉi aventuro, ili rajdis en la direkto al Puerto Lápice, ĉar don Quijote diris, ke nepre ili renkontos tie multajn kaj diversajn aventurojn, tial ke ĝin trairas multaj vojaĝantoj. Sed lin afliktis la difektiĝo de la lanco, kaj ĉi-rilate li diris al sia ŝildisto:

—Mi memoras legi, ke hispana kavaliro nomata Diego Pérez de Vargas, kies glavo rompiĝis en batalo, deŝiris de kverko pezan branĉon kaj en tiu tago plenumis per ĝi tiel grandajn farojn kaj pistis tiom da maŭroj, ke li meritis, ke oni lin honoris per la alnomo Pisto, kaj de tiam li kaj liaj posteuloj nomiĝas Vargas Pisto. Mi tion mencias, ĉar mi pensas deŝiri de la unua kverko renkontota alian branĉon tiel bonan kaj grandan kiel la lia, kaj per ĝi fari tiajn heroaĵojn, ke vi sentos vin feliĉa, ke vi gajnis al vi la rajton ĉeesti ilin kaj atesti farojn apenaŭ kredeblajn.

—Ĉio sidas en la volo de Dio —diris Sancho—. Mi kredas kion via moŝto diras; sed rektigu iom la korpon; vi ŝajnas rajdi duontordite, eble rezulte de la falego.

—Efektive —respondis don Quijote—, kaj mi ne lamentas pro la doloro, ĉar la vagantaj kavaliroj devas ne plendi je ajna vundo, eĉ se tra ĝi elpuŝiĝus liaj intestoj.

—Se tiel, mi diras nenion —diris Sancho—, sed Dio scias, ke tre plaĉus al mi, se vi plendus, kiam io vin doloras. Rilate min, mi plendas, tuj kiam mi sentas eĉ la plej etan doloron, kaj same plendos, escepte se ankaŭ la ŝildistoj devas imiti la vagantajn kavalirojn koncerne la neplendadon.

Don Quijote ne povis ne ridi je la simpla de sia ŝildisto, kaj diris al li, ke li plendu, kiam kaj kiom li dezirus, laŭvole aŭ

kontraŭvole, ĉar ĝisdate li ne legis la malon en la leĝoj de la ordeno kavalira.

Sancho memorigis lin, ke jam estas tempo por manĝi, sed don Quijote respondis, ke li ne sentas apetiton, kaj aldonis, ke la ŝildisto povos manĝi, kiam ajn li volos. Sancho komfortiĝis laŭpove sur la azeno, eltiris el la dusako kion li antaŭe enmetis kaj rajdis tre lante post sia mastro manĝante kaj, de tempo al tempo, trinkante el la boto kun tiela plezuro, ke lin enigus la plej sinregalema tavernestro de Málaga. Ripetante la trinkojn, li tute forgesis la promeson de sia mastro, kaj konfesis en si, ke iri serĉi aventurojn, eĉ plej danĝerajn, donas, pli ol laboron, ripozon.

Nu, tiun nokton ili ripozis inter kelkaj arboj, kaj de unu el ili don Quijote deŝiris sekan branĉon, preskaŭ taŭgan kiel lanco, kaj fiksis al ĝi sur la pinton la feran kapeton, kiun li pli frue prenis de la lanco rompiĝinta. Don Quijote ne dormis la tutan nokton kaj nur pensis pri sia sinjorino Dulcinea, tiel imitante kion li legis en siaj libroj pri la kavaliroj, kiuj vigilis multajn noktojn en boskoj kaj dezertoj, sopire memorante pri siaj damoj. Okazis alie kun Sancho Panza, ĉar tiel plenis lia stomako, kaj ne per cikoria akvo, ke li dormadis unutilo ĝis la mateno, kaj, se lia mastro ne estus lin vokinta, nek la radioj de la suno falantaj sur lian vizaĝon, nek la trilado de la birdoj, kiuj ĝoje kaj multnombre salutis la alvenon de la nova tago, kapablus lin vekti. Kiam li stariĝis, li verŝis al si en la buŝon unu gluton el la boto, trovis tiun pli ŝrumpa ol en la antaŭa nokto, kaj lia koro afliktiĝis, ĉar li pensis, ke la cirkonstancoj ne ŝajnas tre favoraj por la baldaŭa replenigo de la boto. Don Quijote ne volis matenmanĝi, ĉar, kiel dirite, li preferis nutri sin per nur frandaj rememoroj. Ili denove iris ale al Puerto Lápice kaj gin ekvidis proksimume je la tria posttagmeze.

—Tie, frato Sancho —diris don Quijote ĝin rigardante—, ni povos meti la manojn ĝiskubute en la tiel nomatajn aventurojn. Sed, bone memoru se vi vidos min eĉ en la pleja danĝero de la mondo, vi devos ne turni vin al via glavo por defendi min, escepte se la atakantoj apartenas al gento kanajla kaj senranga. Sed se ili estas kavaliroj, la leĝoj de la kavalirismo nek permesas nek rajtigas vin helpi min, ĝis vi mem kavaliriĝos.

—Estu certa, ke mi plene obeos vin pri tio —respondis Sancho—, des pli, ke mi havas pacan naturon kaj ne emas impliki min en batiĝojn kaj kverelojn. Tamen rilate al mia propra sindefendo, mi ne tre atentos tiajn leĝojn, ĉar la homaj kaj diaj reguloj permesas, ke ĉiu sin defendu, se oni volas lin agresi.

—Mi opinias la samon —diris don Quijote—, sed se mi batalas kontraŭ kavaliroj, vi devos bridi vian naturan impulson.

—Konsentite —respondis Sancho— kaj tian regulon mi observos tiel rigore kiel feston dimanĉan.

Ĉe tio aperis sur la vojo du monaĥoj de la ordeno de Sankta Benedikto rajdantaj sur du muloj grandaj kiel dromedaroj. La monaĥoj portis maskojn kontraŭ la polvo kaj ombrelojn, kaj ilin sekvis kaleŝo kun kvar aŭ kvin akompanantaj rajdistoj kaj du mulistoj piede.

En la kaleŝo sidis —tion oni poste sciis— vaska sinjorino kaj ŝi iris ale al Sevilla por kuniĝi kun sia edzo ŝiponta al Indioj por okupi tie tre gravan oficon. La monaĥoj veturis sur la sama vojo kiel la sinjorino, sed ne apartenis al ŝia grupo. Don Quijote, apenaŭ vidis ilin de fore, diris al sia ŝildisto

—Aŭ mi trompiĝas, aŭ ĉi tio estos la plej fama aventuro de ĉiuj tempoj, ĉar tie, en la figuroj nigraj, sendube sin maskas

kelkaj sorĉistoj, kaj ili portas en la kaleŝo forkaptitan principinon. Do necesas, ke mi riparu tian krimon per mia tuta forto.

—Ĉi tio rezultos pli mave ol la afero de la vento-muelejoj — diris Sancho—. Observu, sinjoro, ke tie iras du monaĥoj de Sankta Benedikto, kaj ke en la kaleŝo certe sidas simplaj veturantoj. Pensu bone kion vi faras. Ne lasu, ke la diablo vin trompu.

—Mi jam diris al vi, Sancho —respondis don Quijote—, ke rilate aventurojn vi scias apenaŭ ion. Nun, vidu, ke mi pravas.

Tion dirinte li antaŭiĝis kaj haltis meze de la vojo irata de la monaĥoj. Kiam don Quijote pensis, ke ili jam proksimiĝis sufiĉe kaj povas aŭdi lin, li diris laŭte:

—Monstra kaj demonaj gento, tuj liberigu la noblajn principinojn, kiujn vi perforte tenas en la kaleŝo, aŭ preparu ricevi tujan morton kiel justan punon al viaj nigraj faroj.

La monaĥoj bridis la mulojn, kaj, mirante je la figuro de don Quijote kaj je ties vortoj, respondis:

—Sinjoro kavaliro, ni estas nek monstraj, nek demonaj, sed du religiuloj de Sankta Benedikto. Ni iras nian propran vojon kaj ne scias, ĉu en la kaleŝo veturas principinoj perforte aŭ ne perforte.

—Min ne tuŝas viaj afablaĉaj vortoj, ĉar mi tre bone konas vin, trompa kanajlaro —respondis don Quijote kaj senplie spronis la ĉevalon, celis per la lanco kaj tiel energie kaj kolere impetis kontraŭ la pli antaŭan monaĥon, ke se tiu ne estus sin faliginta de la mulo, don Quijote elĵetus lin grave vundita aŭ eĉ morta sur la grundon. La alia religiulo, vidante kian trakton ricevas lia kompano, spronegis sian kastel-

grandan mulon kaj sin forpafis tra la kampoj pli rapide ol la vento.

Kiam Sancho Panza vidis kuŝi la monaĥon, li desaltis de la azeno, sin ĵetis al li kaj komencis detiri de li la frokon. Ĉe tio alvenis du servistoj de la monaĥoj kaj demandis al Sancho, kial li senvestigas la religiulon. Li respondis, ke la froko leĝe apartenas al li, kiel predo el la batalo, kiun lia sinjoro don Quijote ĵus gajnis. La servistoj, kiuj ne toleris ŝercojn, nek volis scii pri predoj aŭ bataloj, vidante ke don Quijote deviis de tie kaj parolas kun la veturantinoj sidantaj en la kaleŝo, alsaltis kontraŭ Sanchon, renversis lin sur la grundon kaj tiel tradraŝis kaj kalcitris lin, ke ili fine lasis lin senkonscia kaj senspira.

Tiam la monaĥo, timigite, tremante, kun krete pala vizaĝo, plej haste saltis sur la mulon kaj, tuj kiam li vidis sin sur ĝi, spronis ale al sia kompano, kiu je sufiĉe longa distanco atendis la finon de tiel konsterna sceno. Sed ili sentis nenian deziron ĉeesti tra la tuta aventuro, do daŭrigis sian vojon farante al si pli da kruco-signoj, ol se ili portus surdorse la diablon mem.

Kiel dirite, don Quijote parolis kun la sinjorino sidanta en la kaleŝo, kaj diris:

—Belega sinjorino, jam vi povas agi libere, ĉar la orgojlo de viaj kaptintoj kuŝas sur la polvo. Kaj, por ke vin ne suferigu tio, ke vi ne konas la nomon de via savinto, sciu, ke mi nomiĝas don Quijote de La Mancha, vaganta kavaliro, aventuristo kaj sklavo de la senkompare bela sinjorino Dulcinea de El Toboso. Kaj kiel pagon de la bonfaro, kiun vi ĵus ricevis de mi, mi volas nur, ke vi iru al El Toboso, kaj ke vi prezentu vin je mia nomo antaŭ Dulcinea, por diri al ŝi, kion mi plenumis por liberigi vin.

Ĉion ĉi aŭskultis unu el la eskortistoj de la kaleŝo. Li, kiu estis vasko, vidante ke don Quijote ne lasas pasi la kaleŝon, kaj ke li volas, ke ĝi turniĝu kaj iru al El Toboso, proksimiĝis al nia hidalgo, prenis lin je la lanco kaj diris en fuŝa kastilia lingvo, kaj eĉ en pli fuŝa vaska:

—Iru, sinjoro, prenu vin diablo. Kiel Dio kreis min, ke vi lasas kaleŝon, se morti ne kiel vaska mi!

Don Quijote tre bone lin komprenis kaj flegme respondis:

—Se vi estus kavaliro, mi jam punus vian stulton kaj insolenton, sklavo.

—Mi ne kavaliro? —respondis la vasko—. Kristane ĵuras Dion, vi mensoga. Lancon ĵeti, glavon tiri, baldaŭ porti en akvon katon;^[61] vasko tere, kavaliro mare, je la diablo, kavaliro, jes, kaj mensoga vi, se malon diri.

—Nun ni vidos, don Agrejes^[62] —respondis don Quijote kaj, ĵetinte teren la lancon, eltiris la glavon, surbrakigis la ŝildon kaj impetis kontraŭ la vaskon kun la intenco preni de li la vivon. Kiam la vasko vidis lin veni, li eble deziris desalti de la mulo, ĉar ĝi estis aĉa lu-besto kaj sekve nefidinda, sed li havis tempon nur por eltiri sian glavon; bonŝance li troviĝis apud la kaleŝo, de kie li prenis kapkusenon por uzi ĝin kiel ŝildon. Kaj tuj poste ili sin ĵetis unu al la alia, kvazaŭ du ĝismortaj malamikoj.

La aliaj homoj volis ilin pacigi, sed vane, ĉar la vasko diris en sia fuŝa lingvaĵo, ke, se oni ne lasus lin fini la duelon, li mem mortigus sian mastrinon kaj ĉiujn, kiuj provus lin retenigi.

Konsternita kaj timoplena ĉe tia spektaklo, la sinjorino sidanta en la kaleŝo ordonis la koĉeron devii iom de tie, kaj observis de fore la senkompatan duelon, en kies irado la vasko donis tiel fortan hakon sur la ŝultron de don Quijote,

super ties ŝildo, ke, se la kiraso ne estus lin ŝirminta, la klingo lin tranĉus ĝistalie.

Don Quijote sentis la pezon de tiel terura hako kaj diris laŭtege:

—Ho sinjorino de mia koro, Dulcinea, floro de belo! Helpu ĉi kavaliron vian, kiu, por servi al via granda boneco, troviĝas en ĉi grandega danĝero!

Diri tion, levi la glavon, sin ŝirmi per la ŝildo kaj impete ataki la vaskon okazis en la sama momento, ĉar riskante ĉion li pensis meti finon al la duelo per unu sola bato.

La vasko, vidante lin veni, juĝis pro lia impeto lian kuraĝon kaj decidis fari same kiel don Quijote, t.e. bone sin ŝirmi per la kapkuseno, vidinte, ke li povas neniel alflanki la mulon, senspertan en tiaj ludoj kaj tiel lacan, ke ĝi ne kapablas fari eĉ unu paŝon.

Kiel dirite, don Quijote impetis kun la glavo en alto kontraŭ la singardan vaskon, intencante trahaki lin en du pecojn, kaj la vasko lin atendis ankaŭ kun la glavo levita, dum li ŝirmis sin per la kuseno. La ĉeestantoj, teruritaj, angore atendis la sekvon de la batoj, per kiuj la duelantoj minacis unu la alian. En la kaleŝo la damo kaj ŝiaj servistinoj promesis mil votojn kaj oferojn al ĉiuj sanktuloj kaj sanktejoj de Hispanujo, por ke Dio savu ilin kaj ties eskortiston de tiel granda danĝero.

Bedaŭrinde, ĝuste en ĉi suspensa momento, la aŭtoro de ĉi historio interrompis la priskribon de la duelo kaj ekskuzis sin, dirante, ke li trovis nenan alian skribaĵon pri la ceteraj faroj de don Quijote. Tamen la dua aŭtoro de ĉi verko ne povis akcepti la ideon, ke tiel kurioza historio kuŝis en la brakoj de la forgeso, nek tion, ke la klerulo de La Mancha ne havis la sufiĉan sciamon por ne konservi en siaj arĥivoj kaj registroj kelkajn paperojn pri tiel fama kavaliro. Puŝite de tiel

firma konvinko, li ne desperis trovi la ceteron de ĉi agrabla historio, kaj dank' al la favoro de la ĉielo, li ĝin trovis kaj rakontas ĝin en la sekvanta parto.

[61] Laŭ hispana proverbo, fari ion danĝeran kaj malfacilan.

[62] Formulo de minaco komunuza en Hispanujo ĉirkaŭ la jaro 1620.

Ĉapitro 9

Kie oni metas finon al la superba batalo inter la brava vasko kaj la kuraĝa manĉano^[63]

En la unua parto de ĉi historio ni lasis la sentiman vaskon kaj la faman don Quijote kun la nudaj glavoj levitaj kaj pretaj doni du batojn tiel ferocajn, ke, se ili trafus unu la alian, la duelantoj fendiĝus de supre suben kaj splitiĝus kiel granatoj. En tiu streĉa momento ĉi plezuriga historio ĉesis kaj restis kripla tial, ke ĝia aŭtoro ne sciigis nin, kie serĉi la mankantan parton. Tio kaŭzis al mi grandan ĉagrenon, ĉar la ĝuo legi la unuajn paĝojn turniĝis en enuon, kiam mi pensis, ke mi apenaŭ havas ŝancon trovi la ceteran kaj pli grandan parton de tiel franda rakonto. Ŝajnis al mi neebla kaj kontraŭa al ĉiu bona kutimo, ke al tiel brava kavaliro mankus klerulo preta verki pri liaj senegalaj faroj, des pli, ke ĉiuj vagantaj kavaliroj, irantaj —laŭ la diro de la homoj— al siaj aventuroj, facile disponis la servojn de unu aŭ du kleruloj, kiuj rakontis ne nur iliajn farojn sed ankaŭ iliajn plej bagatelajn pensojn kaj sensignifajn paŝojn, kiel ajn kaŝitajn.

Ne eblis do, ke tiel bona kavaliro estus senfortuna ĝis la ekstremo malhavi kion abunde posedis Platir kaj aliaj similaj. Sekve de tio, mi ne povis allasi al mi la ideon, ke tiel brava historio estus nur stumpa kaj sen finiĝo, kaj mi ĵetis la kulpon pri ĝia nekompleteco sur la malignan tempon, kiu ĉion devoras kaj konsumas, kaj kiu sendube detruis aŭ forperdis la ceteron de la rakonto.

Aliflanke mi pensis, ke, tial ke inter la libroj de don Quijote troviĝis kelkaj modernaj, kiaj *Sintrompoj de la ĵaluzo* kaj *Nimfoj kaj paŝtistoj de Henares*, ankaŭ lia historio devus esti

moderna, kaj, se ne en skriba formo, ĝi eble sidus ankoraŭ en la memoro de la homoj de lia vilaĝo kaj de la vilaĝoj najbaraj. Tia penso agitis min kaj instigis en mi la deziron koni ĝisfunde la vivon kaj miraklojn de nia fama hispano, lumo kaj spegulo de la kavaliroj de La Mancha, kaj la unua sin donanta en nia epoko kaj en ĉi mizera tempo al la zorgoj kaj klopodoj de la kavalirismo: ripari ofendojn, helpi vidvinojn, kaj protekti pucelojn similajn al kiuj, virgaj de la kapo ĝis la piedoj, vagabondis kun vipo kaj surĉevale, de monto al monto kaj de valo al valo. Tielaj puceloj ekzistis en la pasinta tempo, neniam dormis subtegmente kaj ordinare mortis okdekjaraj kaj kuŝis en la tombo tiel kompletaj kiel iliaj propraj patrinoj, escepte se antaŭe ne defloris ilin fripono, aŭ kruda kampulo aŭ monstra giganto.

Pro tia motivo kaj pro multaj aliaj, nia brava don Quijote meritas konstantan kaj altan laŭdon, kaj eĉ al mi oni ne devas ĝin rifuzi pro la diligento kaj fervoro uzataj en la serĉado de ĉi agrabla historio. Tamen mi bone scias, ke sen la helpo de la ĉielo, de la hazardo kaj de la fortuno, mankus en la mondo la distro kaj plezuro, kiujn la atentaj legantoj povos ĝui dum preskaŭ du horoj.^[64] La eltrovo okazis jene:

Foje, kiam mi troviĝis en la strato Alcaná, en Toledo, iu knabo venis vendi iom da kajeroj kaj oldaj paperoj al silkisto. Ĉar mi amas ĉion legi, ĝis la ekstremo pluki tiucele ajnan paperaĉon de sur la grundo, mia natura inklino igis min peti de la knabo unu el la kajeroj, kaj mi rimarkis ĝin skribita per arabaj literoj. Mi bone konas ilin sed ne scias ilin interpreti, do ĉirkaŭrigardis, ĉu tie staras mudeharo, kiu volus ĝin legi; ne estis malfacile renkonti unu tian, ĉar tie troveblas interpretistoj eĉ de pli bona kaj antikva lingvo.^[65] Dirante al li kion mi deziras, mi enmanigis al li la kajeron, li apertis ĝin ĉe la mezo, kaj, leginte iom, komencis ridi. Mi demandis al li, kial li ridas, kaj li respondis, ke kaŭze de noto skribita ĉe la marĝeno. Mi petis lin traduki ĝin, kaj plu ridante, li diris:

—Jen la noto: «Ĉi Dulcinea de El Toboso, tiel ofte menciita en la rakonto, laŭdire havis por la salado de porka viando pli lertan manon ol la ceteraj virinoj de La Mancha».

Kiam mi aŭdis lin diri «Dulcinea de El Toboso», min frapis granda surprizo kaj miro, ĉar mi tuj imagis, ke sendube la kajeroj enhavas la historion de don Quijote. Pelate de tia penso, mi instigis lin legi la titolon, kaj li tion faris, rapide turnante la araban en la kastilian kaj dirante: «Historio de don Quijote de La Mancha, verkita de Cide Hamete Benengeli, araba historiisto». Mi bezonis grandan sinregon por kaŝi mian kontenton ĉe la aŭdo de la titolo, kaj antaŭante al la silkisto, mi aĉetis de la knabo la tuton da paperoj kaj kajeroj por duono de realo, kvankam, se li havus ian sagacon kaj scius, kiom multe mi ilin deziris, li povus peti de mi, kaj facile ricevi, pli ol ses realojn.

Poste mi iris kun la mudeharo en la klostron de la katedralo kaj petis lin traduki la kajerojn pri don Quijote en la kastilian sen aldoni kaj sen ellasi ion. Mi diris, ke mi pagus kiom ajn li volus por sia laboro, li kontentiĝis per kvindek funtoj da sekaj vinberoj kaj tri buŝeloj da tritiko kaj promesis fari la tradukon fidele kaj en eta tempo. Sed, por pli faciligi la aferon kaj por ne lasi de sub la mano tiel bonan eltrovaĵon, mi prenis lin al mia hejmo, kie, ĝis iom pli ol ses semajnoj li tradukis la historion ĝuste tia, kia ĝi aperas ĉi tie.

En la unua kajero sidis tre fidela desegno de la duelo inter don Quijote kaj la vasko, kaj la du kontraŭuloj vidiĝis en la sama pozo, kian la historio rakontas: unu, ŝirmata de la ŝildo; la alia, de la kuseno; ambaŭ, kun la glavoj levitaj, kaj la mulo tiel nature pentrita, ke eĉ de unu mejlo fore oni rimarkus ĝian aspekton de lu-besto.

Ĉe la piedo de la vasko legiĝis «Don Sancho de Azpeitia», sendube lia nomo. Kaj ĉe la piedo de Rocinante: «Don

Quijote». La ĉevalo estis mirinde portretita: tiel osta kaj konsumita, tiel profunde ftiza, kun tiel akra spino, ke tre klare evidentiĝis, kial oni donis al ĝi la ĝustan kaj justan nomon Rocinante. Apud ĝi staris Sancho Panza tenante sian azenon per la kondukiloj, kaj ĉe liaj piedoj legiĝis: «Sancho Zancas». Laŭ la desegno li havis la ventron vasta, la korpon kompakta kaj la gambojn longaj, kaj, sendube, de tio venis, ke oni nomis lin Panza kaj Zanca,^[66] ĉar per tiaj nomoj mencias lin la historio. Pluraj aliaj detaloj apenaŭ notindaj videblis en la desegno, sed ili neniel koncernas ĉi veran historion; cetero ĉiuj historioj, se veraj, estas bonaj.

Oni tamen povus objeti rilate la verecon de ĉi rakonto, ke ĝia aŭtoro apartenas al la araba gento, kaj ke la araboj havas tre mensogeman naturon. Tamen mi pensas, ke, pro tio, ke ili tiel malamikas al ni, li certe estis pli ver-ŝpara ol ver-abunda. Efektive en okazoj kiam li devus speciale skribi laŭdojn pri tiel brava kavaliro, ŝajnas, ke li ilin intence prisilentis. Tiel agi montras nur malicon, ĉar la historiisto nepre devas verki precize, laŭvere kaj senpartie, sen ke la intereso, la timo, la rankoro aŭ la pasio deviu lin de la vojo de la vero, kies patrino, la historio, rivalas al la tempo, gardas la grandajn farojn, atestas la paseon, donas ekzemplon kaj lecionon al la nuno kaj signas averton al la futuro. Mi tute certas, ke en ĉi rakonto oni trovos ĉion, kion oni povus deziri, kaj, ke, se io bona mankas en ĝi, pri tio sendube kulpas ties hunde fava aŭtoro, ne ĝia temo. Finfine jen kiel, laŭ la traduko, komenciĝas la dua parto:

Kun la akraj glavoj levitaj la du kuraĝaj kaj furiozaj duelantoj aspektis tiel brave, ke ili ŝajnis minaci ĉielon, teron kaj inferon.

La kolera vasko ellasis la unua la baton kun tiel forta kaj rabia impulso, ke se la glavo ne estus iom deviinta sin dum sia iro, tiu sola bato sufiĉus por meti finon al tiel senindulga

duelo kaj al la aventuroj de nia kavaliro. Sed la fortuno, kiu rezervis lin por pli altaj faroj, tiel deturnis la glavon de lia oponento, ke, kvankam ĝi trafis la livan ŝultron de don Quijote, ĝi faris la solan difekton frakasi la armaĵon de tiu flanko kaj samtempe detranĉi per la sama hako grandan parton de la kasko kaj duonon de la orelo. Ĉio ĉi renversiĝis teren kiel terura rubo, lasante lin en tre delikata situacio.

Ho, granda Dio! Kiel oni povus ĝuste priskribi la rabion de nia manĉano, kiam li sin vidis en tia stato? Mi diru nur, ke li starigis sin denove sur la piedingo, pli forte premis la glavon per la du manoj, kaj kun tiela kolero li ĝin impulsis kontraŭ la vaskon, ke li plene trafis lin sur la kapon, kaj malgraŭ la ŝirmo, ne tre efektiva, de la kuseno, la vasko komencis sangi per la nazo, la buŝo kaj la oreloj ŝanceliĝante sur la selo, de kie li ne deglitis suben, ĉar li ĉirkaŭprenis la kolon de la mulo. Tamen li fine perdis la piedingojn, levis la korpon, kaj la mulo, ankoraŭ terurita de la potenco de la hako, komencis galopi tra la kampo kaj post kelkaj saltaĵoj alĵetis sian mastron sur la grundon.

Don Quijote rigardis ĉion ĉi kun granda flegmo, kaj, vidinte la vaskon fali, deseliĝis, tre rapide proksimiĝis al li, metis al li super la okuloj la pinton de la glavo kaj ordonis lin kapitulaci, alie li detranĉus de li la kapon. La vasko kuŝis tiel komociita, ke li ne povis respondi eĉ unu vorton, kaj sendube pli grava mavo trafus lin, pro la blinda kolero de don Quijote, se la virinoj de la kaleŝo, ĝis tiam spektantaj kun timo la duelon, ne estus irintaj peti foje kaj refoje de lia granda bono kaj favoro ŝpari la vivon de la eskortisto. Ĉe tio don Quijote respondis kun solena kaj fiera tono:

—Plej volonte kaj plezure mi plenumos vian peton, belegaj sinjorinoj, sed nur kondiĉe ke ĉi kavaliro promesu iri al El Toboso kaj sin prezenti je mia nomo antaŭ la senkompara doña Dulcinea, ke ŝi disponu pri li laŭ sia volo.

La timoplenaj kaj konsternitaj damoj, sen konsideri, kion don Quijote postulis, kaj sen demandi, kiu estas Dulcinea, promesis, ke la eskortisto obeos ĉiun ordonon lian.

—Mi fidas je via vorto, kaj ne faros al li novan difekton, kvankam li tre meritas ĝin —respondis don Quijote.

[63] Loĝanto de La Mancha.

[64] Evidentas, ke, kiam Cervantes komencis sian faman verkon, li havis la intencon skribi nur novelon anstataŭ longan romanon.

[65] Ŝajne, aludo al la hebrea.

[66] Iom trivialaj vortoj hispanaj. «Panza», ventraĉo; «zanca», longa kaj magra gambo.

Ĉapitro 10

Pri agrabla babilado inter don Quijote kaj lia ŝildisto
Sancho Panza

Intertempe Sancho Panza, iom mistraktita de la servistoj de la monaĥoj, stariĝis kaj spektis la duelon de sia sinjoro don Quijote, kore preĝante al Dio, ke Li bonvolu doni la venkon al lia mastro, kaj ke ĉi lasta, per sia triumfo, gajnu ian insulon kaj, kiel promesite, nomu lin ĝia gubernatoro. Vidinte do la finiĝon de la duelo kaj tion, ke lia mastro tuj sursaltos denove sur Rocinante, Sancho rapidis teni lian piedingon, kaj, antaŭ ol don Quijote surseliĝis, genuiĝis antaŭ li, prenis lian manon, kisis ĝin kaj diris:

—Bonvolu via moŝto, sinjoro don Quijote, fari min gubernatoro de la insulo, kiun vi ĵus gajnis per ĉi granda duelo. Kiom ajn vasta estas la insulo, mi sentas min sufiĉe forta regi ĝin tiel bone, kiel la plej kompetenta gubernatoro de insuloj de ĉi mondo.

—Frato Sancho —respondis don Quijote— konsideru, ke ĉi aventuro kaj aliaj de simila speco estas, ne aventuroj de insuloj, sed de vojoj, kaj el ili oni gajnas nur rompon de la kapo aŭ perdon de orelo. Tamen okazas aventuroj tielaj, ke dank' al ili mi povos fari vin, ne nur gubernatoro, sed io ankoraŭ pli grava. Dume, paciencu.

Sancho varme lin dankis kaj, denove kisis al li la manon kaj la randon de la kuto, helpis lin surseliĝi. Poste la ŝildisto sursaltis la azenon kaj ekiris post sia mastro, kiu, sen paroli plu kun la kaleŝulinoj kaj eĉ sen adiaŭi ilin, per vigla troto rajdis en proksiman boskon. Sancho sekvis lin per la pleja rapido de sia azeno, sed Rocinante marŝis tiel longapaŝe, ke

la ŝildisto, vidante sin ĉiufoje pli dista, devis krii al sia mastro, ke li haltu kaj atendu. Don Quijote tion faris, bridante la ĉevalon. Fine la laca Sancho alvenis kaj diris:

—Mi pensas, sinjoro, ke konvenus al ni serĉi la protekton de preĝejo, ĉar vi lasis en tiel mizera stato vian kontraŭulon, ke sendube oni denuncos la aferon al la Santa Hermandad,^[67] kaj oni povus aresti nin. Kaj, je Dio, se oni enkarcerigus nin, ni ŝvitus per sango antaŭ ol retrovi la liberon.

—Silentu! —respondis don Quijote—. Ĉu iam vi vidis aŭ legis, ke vaganta kavaliro respondus pri siaj agoj antaŭ la justico, kiom ajn estis la nombro de liaj homicidoj?^[68]

—Mi preferas ignori *omecillos*^[69] —diris Sancho—. Kontraŭ neniu mi sentis ilin. Sed mi ne ignoras, ke la duelantoj estas koncerno de la Santa Hermandad. Ĉio alia ne gravas.

—Nu, ne zorgu, amiko —respondis don Quijote—. Mi elprenus vin el la manoj de la ĥaldeoj,^[70] des pli el tiuj de la Hermandad. Sed diru, ĉu vi vidis iam sur la tuta tero kavaliron pli bravan ol mi? Ĉu vi legis en la historio pri alia homo pli kuraĝa por ataki, pli hardita por elteni, pli lerta por vundi kaj pli ruza por renversi?

—Verdire, eĉ ne unu historion mi legis, ĉar mi scias nek legi, nek skribi, sed mi certas, ke en mia tuta vivo mi ne servis mastron tiel aŭdacan kiel via moŝto. Kaj Dio volu, ke tian aŭdacon ni ne pagu, kie mi diris. Sed mi petas vian moŝton, bonvolu kuraci vin, el la orelo fluas multa sango. En la dusako mi portas ĉarpion kaj iom da blanka unĝento.

—Tio tute ne necesus —respondis don Quijote— se mi estus farinta fiolon da balzamo de Fierabrás, kies unu sola guto ŝparas tempon kaj kuracilojn.

—Pri kia fiolo kaj pri kia balzamo temas? —demandis Sancho.

—Dank' al la balzamo, kies recepton mi tenas en la memoro, oni ne devas timi pereigajn vundojn, eĉ ne la morton mem. Mi faros iom da balzamo, transdonos ĝin al vi, kaj se vi vidus, ke en batalo oni trahakas min ĉe la mezo de la korpo —kio ofte okazas al la kavaliroj—, vi devus fari nur tion: preni la parton de la korpo falintan al la grundo kaj tre delikate, sen doni tempon al la sango frostiĝi, alpremi ĝin al la alia duono restinta sur la selo, zorgante, ke la du partoj juntiĝu plej ekzakte. Poste vi donus al mi du glutojn de la balzamo kaj vidus min denove sana kiel pomo.

—Se tiel —diris Sancho—, jam de nun mi rezignas la regadon de la promesita insulo, kaj kiel pagon de miaj multaj kaj bonaj servoj mi volas nur, ke via moŝto donu al mi la recepton de tiel mirinda likvoro, ĉar mi pensas, ke ĉiu unco da ĝi valoras, kie ajn, almenaŭ du realojn, kaj mi bezonas ne pli por honeste kaj ripoze vivi. Sed mi volus scii, ĉu fari ĝin kostas multe.

—Per ne pli ol tri realoj oni povas fari dek du pindojn.

—Je Dio! Kion do atendas via moŝto, ke vi ne faras ĝin, ke mi lernu?

—Silentu, amiko —respondis don Quijote—. Mi rezervas por vi pli grandajn sekretojn kaj eĉ pli grandajn rekompencojn. Sed nune mi flegu min, ĉar la orelo doloras min, pli ol mi volus.

Sancho elprenis el la dusako ĉarpion kaj unĝventon. Sed kiam don Quijote rimarkis sian kaskon frakasita, li preskaŭ perdis la kapon kaj, metante la manon sur la glavon kaj levante la rigardon al la ĉielo, diris:

—Mi ĵuras je la Kreinto de ĉiuj aĵoj, kaj je la kvar sanktaj evangelioj en ties tuto, vivi la saman vivon, kiun la granda markizo de Mantua trudis al si, kiam li ĵuris venĝi la morton de sia nevo Valdovinos, t.e. ne manĝi el surtabla pano nek kuŝi kun la edzino, aparte de aliaj aferoj, kiujn mi forgesis, sed al kiuj mi same devontigas min, ĝis mi plene venĝos min kontraŭ la persono farinta al mi ĉi ruinon.

—Konsideru via moŝto, sinjoro don Quijote, ke se la kavaliro plenumis vian ordonon prezentiĝi antaŭ doña Dulcinea de El Toboso, li kvitiĝis; kaj li ne meritas alian punon, se li ne faris novan delikton.

—Vi parolis trafe kaj saĝe —respondis don Quijote—, do mi nuligas la ĵuron rilate la novan venĝon kontraŭ li, sed reĵuras kaj konfirmas, ke mi vivos la vivon menciitan, ĝis mi perforte prenos de kavaliro alian kaskon tiel bonan. Kaj kredo, mia ĵuro ne estos nura ŝaŭmo kaj fumo. Ekzistas la imitenda precedenco, ke tio sama okazis punkton post punkto rilate la helmon de Mambrino, kiu helmo tiel kare kostis al Sacripante.

—Prefere sendu tiajn ĵurojn al la diablo, sinjoro, ĉar ili difektas la sanon kaj damaĝas la konsciencon. Kion fari do, se ni ne renkontos dum longa tempo unu homon kun kasko? Ĉu observi la ĵuron, kaj ĝene kaj komfortomanke dormi vestita, ne kuŝi en loĝata loko kaj fari la aliajn mil pent-ferojn de la olda kaj freneza markizo de Mantua, kies ĵuron vi volas nun revalidigi? Konsideru via moŝto, ke sur ĉi vojo ordinaro iras, ne armitaj kavaliroj, sed mulistoj kaj ĉaristoj, kaj aparte de tio, ke ili ne portas helmon, eble ili eĉ ne aŭdis tian vorton en sia tuta vivo.

—Vi ne pravas ĉe tio —diris don Quijote—, ĉar, antaŭ ol pasos du horoj, vidiĝos sur ĉi vojoj pli da kavaliroj, ol da ili sieĝis la kastelon Albraca por kapti la belan Angélica.

—Nu bone, estu tiel, kaj Dio volu, ke ni sukcesu, kaj ke baldaŭ alvenu la momento gajni la insulon, kiu tiel kare kostas al mi. Poste mi mortus kontenta.

—Mi jam diris, ke vi ne devas zorgi pri tio, Sancho, ĉar, manke de insulo, la regno de Danujo aŭ de Sobradisa konformus al vi kiel ringo al fingro, kaj eĉ pli plezurigus vin pro tio, ke ili situas sur firma tero. Tio okazos siatempe, sed nun prefere rigardu, ĉu vi havas en la dusako ion por manĝi. Ni devas baldaŭ serĉi kastelon, kie tranokti kaj fari la balzamon, ĉar, je Dio, la orelo tre doloras min.

—Mi havas unu cepon, unu pecon de fromaĝo kaj kelke da pankrustoj —diris Sancho— Ne tre valora viktualio por tiel brava kavaliro kiel via moŝto.

—Tre falsan opinion vi havas! Sciu, Sancho, ke la vagantaj kavaliroj rigardas afero de honoro fasti unu tutan monaton kaj, kiam ili manĝas, nutri sin per io ajn ĉe-mane. Vi bone komprenus ĉion ĉi, se vi estus leginta tiom da historioj kiel mi. En ties paĝoj mi ne trovis, ke la kavaliroj manĝis, escepte en okazaj kaj pompaj festenoj aranĝitaj honore al ili. La ceterajn tagojn ili nutris sin per floroj de la kampoj. Kompreneble ili ne povis vivi sen manĝi kaj sen kontentigi la aliajn naturajn bezonojn, ĉar ili estis homoj kiel ni, sed oni devas konsideri ankaŭ, ke ili pasigis la pliparton de sia vivo en boskoj kaj dezertoj kaj sen kuiristo, do ilia ordinara manĝo certe konsistis el simpla viktualio, kiel tio, kion vi ĵus proponis al mi. Tiel, do, amiko Sancho, kio min plezurigas ne devas vin aflikti, kaj bonvolu ne refari la mondon nova, nek elsvingi la vagantan kavalirismen el ties ĉarniroj.

—Pardonu via moŝto —diris Sancho—. Kiel dirite, mi scias nek legi nek skribi, do mi ne konas la regulojn de la kavalira profesio, sed de nun mi provizos la dusakon per diversaj specoj de sekaj fruktoj por via moŝto, ĉar vi estas kavaliro,

kaj por mi, ĉar mi ne estas kavaliro, rezervos ion kun pli da substanco kaj da kortobirda viando.

—Mi diris —respondis don Quijote—, ne ke la vagantaj kavaliroj nepre devas manĝi nur fruktojn, kiajn vi menciis, sed ke ilia ordinara manĝo certe konsistis el fruktoj kaj el kelkaj herboj troveblaj en la kamparo, konataj de ili kaj ankaŭ de mi.

—Bone, se oni konas la herbojn, ĉar mi komencas suspekti, ke iam necesos profiti tielan scion.

Ĉe tio Sancho elprenis el la dusako kion li menciis, kaj ambaŭ manĝis en amika konkordo. Dezirante serĉi tranoktejon, ili baldaŭ finis sian mizerankaj sekan manĝon, sursaltis la rajd-bestojn kaj ilin akcelis, intencante alveni, antaŭ la noktiĝo, al iu vilaĝo. Sed apud kelkaj kabanoj de kapro-paŝtistoj ili perdis la sunon kaj la esperon trafi kion ili deziris, do ili decidis tie tranokti. Kiom Sancho bedaŭris, ke li ne alvenis al vilaĝo, tiom ĝojis don Quijote, ke li dormos sub la libera ĉielo. Ĉar ŝajnis al li, ke tiaj okazoj donas al li la ŝancon pruvi sin inda je sia kavalireco.

[67] Hispane «Sankta Frataro»: iama institucio por persekuto kaj aresto de krimuloj en kampoj kaj neloĝataj lokoj.

[68] Neologismo: Homo-mortigo.

[69] En la antikva hispana lingvo: «rankoro», «malbonvolo». Sancho ne bone komprenas la vorton «homicido» kaj konfuzas ĝin kun «omecillo».

[70] Ŝajnas aludo al la diroj de la profeto Jeremia, ke Dio ĵetos la judojn en la manojn de la ĥaldeoj.

Ĉapitro 11

Pri tio kio okazis inter don Quijote kaj kelkaj kapro-paŝtistoj

La kapro-paŝtistoj varme akceptis la kavaliron, kaj Sancho, kondukinte la ĉevalon kaj la azenon al la loko, kiun li trovis plej konvena, lasis sin altiri al laodoro de kelkaj pecoj de kaprida viando bolantaj en kaldrono super fajro. Li volis rigardi, ĉu ili jam taŭgas por pasi de la kaldrono al la stomako, sed ne povis, ĉar la paŝtistoj apartigis la pecojn de la fajro, etendis sur la grundon kelkajn ŝafajn felojn, tien rapide pretigis sian rustikan manĝon kaj sincerkore invitis la kavaliron kaj la ŝildiston dividi kun ili ties porciojn. La ses paŝtistoj tie tranoktantaj ronde sidiĝis kaj senceremonie petis de don Quijote, ke li sidiĝu sur trogo, kiun ili renversis por li. Don Quijote tion faris kaj Sancho restis stare por plenigi al li la kornon servantan kiel pokalo. Lia mastro, vidante lin stari, diris:

—Por ke vi vidu, Sancho, ke la vaganta kavalirismo havas multe da bono, kaj ke la apartenantoj al ajna branĉo ĝia povas rapide akiri la honoron kaj la estimon de la mondo, mi volas, ke vi sidiĝu miaflanke en la akompano de ĉi bonaj homoj, ke vi okupu la saman nivelon de via mastro kaj natura sinjoro kaj ke vi manĝu kaj trinku el miaj telero kaj glaso, ĉar pri la vaganta kavalirismo oni povas diri, same kiel pri la amo oni diras: ke ĝi ĉion egaligas.

—Mi tre dankas —respondis Sancho—, sed mi devas konfesi al via moŝto, ke, se mi havus abundan manĝon, mi plezure ĝin konsumus, tiel stare kaj solece, kiel side kaj apud imperiestro. Kaj, se diri la veron, nuraj pano kaj cepoj pli

bongustas al mi en mia angulo, sen zorgoj pri ĉetablaj etiketoj kaj ceremonioj, ol la meleagro de aliaj lokoj, kie mi devus lante maĉi, ŝpare trinki, ofte viŝi al mi la buŝon, ne terni nek tusi, se mi tion dezirus, nek fari ĉion ceteran permesatan de la soleco kaj la libero. Tiel do, mia sinjoro, bonvolu anstataŭigi per alio pli profitodona kaj konvena la honoron, kiun via moŝto volas fari al mi asertante, ke, en mia ŝildista funkcio, mi estas membro de la vaganta kavalirismo. Mi tre dankas la honoron sed rezignas ĝin de nun ĝis la finiĝo de la mondo.

—Malgraŭ ĉio, sidiĝu, ĉar Dio levas la humiliĝantan.

Kaj preninte lin je la brako, don Quijote devigis lin sidiĝi apude. La paŝtistoj komprenis nenion el tia slango de ŝildistoj kaj migrantaj kavaliroj kaj limiĝis silente manĝi kaj rigardi siajn gastojn, kiuj kun granda senĝeno kaj apetito glutis pecojn de viando grandajn kiel la pugno. Kiam finiĝis la kapridaĵo, oni metis sur la felojn grandan kvanton da glanoj kaj la duonon de fromaĝo pli dura ol mortero. Dume la korno ne ripozis, ĉar ĝi ofte rondiris —jen plena, jen vaka— kiel trogo de norio, kaj baldaŭ elĉerpiĝis la enhavo de unu el la du videblaj felsakoj da vino. Ŝtopinte la stomakon, don Quijote prenis manplenon da glanoj kaj, rigardante ilin atente, eldiris la jenan paroladon:

—Feliĉa la epoko kaj feliĉaj la tempoj, kiujn nomis oraj la antikvuloj, ne pro tio, ke la oro (alte estimata en nia fera epoko) estus facile akirebla, sed pro tio, ke la homoj tiamaj ne konis ankoraŭ la sencon de la vortoj «via» kaj «mia». En tiel glora epoko oni ĉion posedis komune kaj bezonis por manĝi nur levi la manon kaj preni de la branĉoj de fortikaj kaj prodigaj kverkoj ties dolĉan kaj maturan frukton. Klaraj fontoj provizis la homojn per abundego da akvo pura kaj delica. La diligentaj kaj saĝaj abeloj formis sian regnon en la fendoj de la rokoj kaj en la kavoj de la arboj kaj sen ia

egoismo proponis al la unua alvenanto la riĉan rikolton de sia dolĉega laboro. La bravaj kork-arboj demetis pro nura ĝentilo sian larĝan kaj leĝeran ŝelon, kiun oni komencis uzi, defende kontraŭ la rigoroj de la ĉielo, por tegmenti la kabanojn konstruitajn sur krude ellaboritaj fostoj. Ĉie regis paco, ĉie amikeco, ĉie konkordo; la peza soko de la kurbaj plugiloj ne kuraĝis ankoraŭ fosi aŭ bori la kompateman internon de nia unua patrino, kies vasta kaj fekunda sino, sin apertis ĉie, sen ia perforto, por nutri, satigi kaj kontentigi sian idaron. La simplaj kaj belaj paŝtistinoj vagadis tiam kun liberaj haroj de valo al valo kaj de monto al monto, portante nur la vualon necesan por kovri kion la ĉasto volas kaj volis, ke oni kovru. Iliaj ornamoj ne similis al la nunaj garnoj, pompaj pro la purpuro de Tiro kaj pro la mult-maniere torturitaj silkoj. Kun nur kelkaj folioj de hedero kaj lapo interplektitaj la tiamaj paŝtistinoj certe vidiĝis tiel elegante tualetitaj kiel la aktualaj korteganinoj, kies rara kaj ekstravaganca modo fontas el la kapricemo de ilia pigra vivo.

»Tiam oni konfesis sian amon same simple kaj sincere, kiel la koro ĝin sentis, kaj oni ne bezonis ĝin emfazi per artifikaj ĉirkaŭparoloj. Nek fraŭdo, nek trompo, nek malico ekzistis miksitaj kun vero kaj sincero. La justico sidis en siaj propraj limoj, kaj ne aŭdacis ĝeni aŭ ofendi ĝin la serĉantoj de favoroj kaj profitoj, dum en la nuna tempo ili ofte ĝin difektas, ĝenas kaj persekutas. La leĝo ne dependis ankoraŭ de la kapricaj interpretoj de la juĝistoj, ĉar tiam ne ekzistis procesoj nek juĝatoj. Kiel dirite, la puceloj kaj la ĉasto libere vagadis sen timi la sintrudon de amoremuloj kaj la atencojn de la lascivo; kaj, se la knabinoj perdis la virgecon, tio okazis, ĉar ili donis sin propravole kaj laŭ sia deziro.

»Sed nun, en nia abomeninda epoko, la puceloj tute ne sekuras, eĉ se oni kaŝus kaj enfermus ilin en alia Kreta labirinto, ĉar tien, tra la fendoj de la muroj, aŭ tra la aero

mem, enrompus en la koron de la junulinoj la pesto de la amo, kaj ilin koruptus malgraŭ ties enfermiteco. Tial ke kun la paso de la tempo kreskis la malico, fondiĝis la ordeno de la vagantaj kavaliroj por defendi pucelojn, protekti vidvinojn, kaj helpi orfojn kaj mizerulojn. Mi estas membro de la ordeno, fratoj paŝtistoj, kaj mi vin dankas, ĉar vi kore akceptis kaj regalis min kaj mian ŝildiston. Kvankam la natura leĝo devigas ĉiun homon amike trakti la vagantajn kavalirojn, tamen la fakto, ke vi akceptis kaj regalis nin sen koni tian devon, estas sufiĉa motivo por aprezi ankoraŭ pli varme vian bonvolon.

Tiel longan kaj tute nenecesan oratoraĵon diris nia kavaliro, ĉar la glanoj igis lin memori la oran epokon, kaj li ekhavis la kapricon paroladi al la paŝtistoj, kiuj, sen respondi eĉ unu vorton, aŭskultis lin gape kaj mire. Siaflanke Sancho same silentis, sed ne ĉesis manĝi glanojn kaj ofte vizitis la duan felsakon, kiun oni antaŭe pendigis de kork-arbo, por ke la vino refreŝiĝu. La parolado de don Quijote daŭris pli ol la manĝo, sed, kiam tiu finiĝis, diris unu el la paŝtistoj:

—Por ke via moŝto estu pli certa ankoraŭ, ke ni regalas vin plej bonvole, ni deziras doni al vi plezuron kaj kontenton per la kantoj de unu kompano nia baldaŭ alvenonta. Temas pri knabo tre inteligenta kaj profunde tuŝita de amo, kaj plie kaj ĉefe li scipovas legi kaj skribi kaj ludas belege la ribekon.

Apenaŭ ĉesis paroli la paŝtisto, aŭdiĝis la sono de ribeko, kaj iom poste alvenis la ludanto, junulo proksimume dudekdujara kaj de tre agrabla aspekto. Liaj kompanoj demandis lin, ĉu li jam manĝis, la junulo jese respondis, kaj la paŝtisto unue parolinta diris:

—Tiel do, Antonio, vi povus fari al ni la plezuron kanti ion, ke ĉi sinjoro gasto nia vidu, ke ankaŭ en montoj kaj arbaroj troviĝas muzikantoj. Mi jam parolis al li pri viaj kapabloj kaj

deziras, ke vi montru kaj pruvu ilin veraj. Mi petas vin do sidiĝi kaj kanti la romancon pri viaj amoj, verkitan de via onklo la prebendulo kaj tiel multe ŝatatan en la vilaĝo.

—Tre volonte —respondis la junulo.

Kaj sen atendi, ke oni petu lin duan fojon, li sidiĝis sur la stumpo de kverka trunko, agordis la ribekon kaj komencis kanti ĉarme kaj gracie la jenan romancon:

Jes, Olalla, mi tre scias,
ke vi min profunde amas,
kvankam vi ne montras tion
eĉ per rigardet' afabla.
Ke vi amas min, mi certas,
ĉar, knabino, vi tre saĝas,
kaj la saĝaj reciprokas
amon veran kaj konstantan.
Estas vere, ke, kelkfoje
vi rivelas, ke vi havas
koron duran kiel bronzo
kaj granitan bruston blankan.
Inter la riproĉoj, kiujn
pro pudor' vi al mi faras,
kredas mi distingi iel
la esperon alvokanta.
Al ĝi kroĉas sin persiste
mia fido egalflama,
kiun nek disdegn' etigas
nek favoro igas granda.
Se konsistas el ĝentilo
tiu amo via, kara,
vi ĝentilas tiel multe,
ke mi sentas min amata.
Kaj se oni devas peni
por konkeri vin, Olalla,

mi jam faris kelkajn penojn
al vi eble ne malplaĉajn.
Certe vi rimarkis iam,
ĉar fojfoje ĝi okazas,
ke mi portas dum la lundoj
la kostumon pordimanĉan.
Ĉar la amo kaj la garno
iras sur la vojo sama,
antaŭ vi mi volas ĉiam
montri min alloge danda.
En konkuro kun la kokoj,
al vi kantis mi senlaca
eĉ en la profunda nokto.
Kaj pro vi, mi ne plu dancas.
Pri la belo via multas
miaj diroj veraj, laŭdaj.
Sed pro ili kelkaj inoj
min kritikas kaj kontraŭas.
Ĉe Teresa mi vin laŭdis,
tiam diris ŝi emfaza:
«Vi ŝin kredas anĝelino,
sed ŝi estas nur ĉimpanza,
kaj nur helpe de la ŝminkoj
kaj de la postiĉoj haraj
eĉ Amoron mem ŝi trompas
per aspekto tute falsa».
Mi obĵetis, ŝi koleris,
vokis ŝi la kuzon bravan.
Li defiis min... Vi konas
la eventon tiutagan.
Mi vin amas purakore
kun intenco plej morala.
Mi sopiras vin laŭdece,
konkubecan mi ne planas.
L' Eklezio paroĵn ligas
per ligilo silka, daŭra.

Se vi iras sub la jugon,
al la jugo mi min laĉas.
Kaj se vi ne volas tion,
ĵuras mi je ĉio sankta,
ke nur por kapuceniĝi
lasus mi ĉi monton aspran.

Ĉi tie la junulo finis la romancon, kaj, kvankam don Quijote petis lin kanti ion plian, Sancho Panza oponis kaj, ĉar li preferis dormi ol aŭskulti kanzonojn, diris al sia mastro:

—Pli konvenus, via moŝto, se vi serĉus lokon por dormi. Ĉi bonaj homoj laboras dum la tuta tago kaj ne povas permesi al si pasigi la nokton kantante.

—Mi komprenas vin, Sancho —respondis don Quijote—. Evidentas, ke viaj vizitoj al la felsako postulas pli grandan kompenson da dormo ol da muziko.

—Benata estu Dio, ni ĉiuj trovas la vinon bona —diris Sancho.

—Mi ne neas tion —respondis don Quijote—. Aranĝu vin, kiel ajn vi volos, sed al la membroj de mia profesio decas la vigilo pli ol la dormo. Cetere, estus bone, se vi denove pansus al mi la orelon, ĉar ĝi doloras min pli ol necese.

Sancho obeis, kaj unu paŝtisto, vidante la vundon, diris al don Quijote ne plu zorgi, ĉar li aplikos efikan rimedon, ke li baldaŭ resaniĝu. Li prenis kelkajn foliojn de rosmareno, maĉis ilin, miksis ilin kun iom da salo, aplikis ilin al la orelo, bandaĝis ĝin tre zorge kaj certigis lin, ke ne necesas alia kuracilo; kio efektive pruviĝis vera.

Ĉapitro 12

Pri tio, kion rakontis paŝtisto al la akompanantoj de don Quijote

Ĉe tio venis unu el la junaj paŝtistoj komisiitaj alporti provizojn el la vilaĝo.

—Ĉu vi ne scias kio okazas, kompanoj? —li diris.

—Kiel ni scius? —respondis unu.

—Sciu do —daŭrigis la junulo—, ke ĉi matene mortis la fama studento-paŝtisto Crisóstomo, kaj oni diras, ke li mortis de amo al la diabla Marcela, la filino de Guillermo la riĉa, la knabino vaganta ĉi-ĉirkaŭe en paŝtista kostumo.

—Ĉu? —demandis unu paŝtisto.

—Efektive, pro Marcela —respondis la junulo—. Kaj, plej rimarkinde, li testamentis, ke oni enterigu lin en la kamparo, kvazaŭ li estus maŭro, ĉe la piedo de la fonto-roko, apud la kverko. Laŭ la famo kaj ŝajne laŭ siaj propraj diroj, li vidis ŝin la unuan fojon ĉe la roko. Krome li formulis en la testamento aliajn dispoziciojn tiel strangajn, ke la pastro de la vilaĝo diras, ke ne decus plenumi ilin, ĉar ili ŝajnas propraj al paganoj. Al tio respondas Ambrosio, la granda amiko de Crisóstomo, la studento lin akompaninta ankaŭ en paŝtista kostumo, ke oni plenumu absolute ĉion, kiel Crisóstomo ordonis, kaj kaŭze de tiaj eventoj regas granda ekscito en la vilaĝo. Laŭdire oni fine faros kion volas Ambrosio kaj la paŝtistoj, liaj amikoj, kaj morgaŭ oni venos enterigi Crisóstomon kun granda pompo en la diritan lokon. Sendube

la sceno estos vidinda, kaj mi certe ĉeestos ĝin, eĉ se mi ne povos reveni al la vilaĝo morgaŭ mem.

—Ni ĉiuj ĉeestos —respondis la paŝtistoj— sed ni lotos, kiu restos ĉi tie por gardi la brutaron.

—Vi pravas, Pedro —diris unu—, sed ne necesos loti, ĉar mi restos en la loko de ĉiuj. Ne pensu, ke mi agas tiel pro sindono aŭ pro manko de scivolo. La motivo estas, ke mi ne povas marŝi, kaŭze de la dorno enpuŝiĝinta al mi en la piedon antaŭ tagoj.

—Tamen, ni same dankas vin —respondis Pedro.

Don Quijote demandis al Pedro, pri kiu mortinto kaj pri kiu paŝtistino temas. Al tio Pedro respondis, ke, kiom li scias, la mortinto estis riĉa hidalgo de vilaĝo de la tieaj montaroj, kaj ke, studinte multajn jarojn en Salamanca, li revenis al sia vilaĝo kun la reputacio de homo saĝa kaj klera. Oni precipe diris pri li, ke li scias la stelo-sciencojn kaj la farojn de la suno kaj la luno, ĉar li antaŭdiris la klipson de ambaŭ astroj.

—La obskuriĝo de tiel grandaj lumofontoj nomiĝas «eklipso», ne «klipso» —diris don Quijote.

Pedro, ignorante tian bagatelon, daŭrigis sian rakonton, dirante:

—Li divenis ankaŭ, ĉu la jaro estos fruktodona aŭ estila.

—«Sterila» vi volas diri, amiko —korektis don Quijote.

—«Estila» aŭ «sterila» valoras proksimume la saman — respondis Pedro—. Nu, lia patro kaj liaj amikoj riĉiĝis, ĉar ili kredis lin kaj sekvis liajn konsilojn: «Ĉi-jare semu ne tritikon, sed hordeon», aŭ «Komencu semi kikerojn, ne hordeon» aŭ

«La venonta jaro donos egan rikolton de oliv-oleo, sed en la tri sekvantaj jaroj eĉ ne unu olivo kreskos».

—Tiu scienco nomiĝas astrologio —diris don Quijote.

—Mi ne konas ĝian nomon, sed li sciis tion kaj multon alian. Nu, kelkajn monatojn post lia alveno de Salamanca, unu tagon li demetis la longan studentan robon, kiun li ordinare portis, kaj aperis subite en paŝtista kostumo kun bastono kaj fela jako. Similan veston surmetis ankaŭ granda amiko kaj kunstudento lia, nomata Ambrosio. Mi forgesis diri, ke la mortinta Crisóstomo faris tre belajn koplojn, eĉ la karolojn por la Kristnasko kaj la teatraĵojn por la Difesto, kaj ilin ludis la vilaĝaj junuloj, kaj liaj verkoj gajnis al si grandan laŭdojn. Kiam la vilaĝanoj vidis, ke la studentoj subite ŝanĝiĝis je paŝtistoj, ili miregis, ne povante kompreni la motivon de tiel stranga transformiĝo. Tiutempe la patro de Crisóstomo estis jam forpasinta, kaj la junulo heredis konsiderindan proprajon tiel moveblan kiel nmoveblan, gregojn da multenombraj brutoj maĵoraj kaj minoraj^[71] kaj grandan kvanton da kontanta mono. Li venis en plenan posedon de ĉio ĉi, kaj verdire li ĝin meritis, kaj li estis tre bona kaj helpema kaj amiko de la honestaj. Krome li havis tre agrablan mienon. Oni sciis poste, ke li alivestis sin nur por sekvi tra ĉi sovaĝejoj la paŝtistinon Marcela, antaŭe menciitan de nia knabo, ĉar la povra Crisóstomo enamiĝis al ŝi. Kaj nun, mi volas diri al vi, kia estas ŝi. Eble, eĉ sen eble, vi nek aŭdis, nek aŭdos ion similan, eĉ se vi vivos pli da jaroj ol Sarna.^[72]

—Diru «Sara» —respondis don Quijote, ne povante elteni la misprononcojn de la paŝtisto.

—Sarna vivas tre longe —diris Pedro—, kaj se vi, sinjoro, korektos min ĉiumomente, ni ne finos eĉ en unu jaro.

—Pardonu, amiko. Mi vin avertis pro la granda diferenco inter «Sarna» kaj «Sara». Sed vi tre trafe respondis, ĉar pli longe vivas sarna ol Sara. Kaj plu rakontu... mi ne interrompos vin denove.

—Mi diras, do, mia tre kara sinjoro, ke en nia vilaĝo vivis kampulo eĉ pli riĉa ol la patro de Crisóstomo. Li nomiĝis Guillermo, kaj Dio donis al li, krom multaj kaj grandaj havaĵoj, filinon, kies patrino mortis akuŝante ŝin. Ŝi estis la plej virta virino de ĉi regiono, kaj mi kvazaŭ vidas nun ŝian vizaĝon kun la luno en unu vango kaj la suno en la alia. Sed precipe ŝi estis tre diligenta mastrumantino kaj amikino de la mizeruloj, do mi kredas, ke ŝia animo ĝuas nun ĉe Dio, en la transa mondo. Ŝia edzo Guillermo pereis de aflikto pro la morto de tiel bona virino, lasinte la filinon, riĉan kaj tre junan, sub la zorgado de unu el ŝiaj onkloj, pastro kaj prebendulo de nia vilaĝo. La knabino kreskis tiel bela, ke ŝia aspekto memorigis al ni la grandan ĉarmon de ŝia patrino, kaj oni jam pensis, ke la filino superus ŝian belon. Kaj okazis, ke, kiam ŝi atingis la dekkvaran aŭ dekkvinan jaron de ŝia vivo ĉiu, kiu ŝin vidis, dankis Dion, ĉar Li kreis ŝin tiel bela, kaj la pliparto freneze enamiĝis al ŝi. Ŝia onklo gardis ŝin tre zorge kaj apenaŭ permesis ŝin eliri el la domo; tamen la famo pri ŝia granda belo tiel diskoniĝis, ke pro tio, kaj pro ŝiaj multaj riĉoj, venis la plej bonaj viroj, ne nur de nia vilaĝo, sed de la aliaj en rondo de multaj mejloj, peti, insisti kaj tedi ĉe ŝia onklo, ke li donu ŝin edzinige. Li certe volis fari tion, kiam ŝi atingis sufiĉan aĝon, sed, kiel bona kristano, li preferis atendi, ke ŝi mem libervole decidu. Al tio ne puŝis lin la penso, ke, prokrastante ŝian edzinigon, li plu ricevos la profitojn kaj avantaĝojn de sia kuratoreco. La honestan intencon de la pastro oni rekonis kaj laŭdis en la babil-rondoj de la vilaĝo. Sciu, sinjoro vaganto, ke en ĉi lokoj ŝpare loĝataj, ĉion oni komentis kaj kritikis, kaj estu certa, kiel mi, ke pastro sendube kondukas treege bone, kiam liaj paroĥanoj devas laŭde paroli pri li, speciale en la vilaĝoj.

—Vi pravas —diris don Quijote— kaj nun daŭrigu. La rakonto bonegas, kaj vi, Pedro, diras ĝin kun gracio.

—La graco de Dio ne manku al mi. Nu, bone. Kvankam la onklo informis la nevinon pri la kvalitoj de ĉiuj svatiĝanto kaj petis ŝin elekti unu laŭvole kaj edziniĝi, ŝi nur respondis, ke ŝi ankoraŭ ne inklinas al tio, kaj, ke, estante tiel juna, ŝi ne sentas sin kapabla porti la ŝarĝon de la edzineco. Ĉe tiel ŝajne prudentaj ekskuzoj, la onklo ĉesis urĝi ŝin kaj atendis, ke, kiam ŝi iom pli maturiĝos, ŝi scios elekti al si taŭgan kompanon laŭ sia gusto. Li diris, kaj diris prave, ke la gepatroj devus ne aranĝi la edziĝon de la filoj kontraŭ ties volo. Sed jen, unu tagon, subite kaj neatendite Marcela aperis paŝtistine vestita, kaj malgraŭ la opono de sia onklo kaj la ceteraj vilaĝanoj, ŝi iris al la kampoj kun la aliaj paŝtistinoj kaj dediĉis sin gardi sian brutaron. De kiam oni ŝin vidis publike, kaj ŝia belo montriĝis al ĉies okuloj, mi ne povus ĝuste kalkuli kiom da riĉaj junuloj, hidalgoj kaj kampuloj surmetis veston paŝtistan kiel Crisóstomo, kaj nun sekvas kaj provas amindumi ŝin. Unu el ili, kiel dirite, estis nia mortinto, kaj laŭfame li sentis al ŝi, ne amon, sed adoron. Oni ne pensu, tamen, ke Marcela, elektinte tiel liberan kaj senĝenan vivmanieron, pekis eĉ minimume kontraŭ sia ĉasto kaj virto; male, tiel rigore ŝi zorgas sian honoron, ke neniu el ŝiaj adorantoj kaj aspirantoj fanfaronis, nek povas rajte fanfaroni, ke ŝi donis al li eĉ joton da espero, ke ŝi cedos al liaj deziroj. Kvankam ŝi ne evitas la kompanion kaj konversacion de la paŝtistoj kaj traktas ilin ĝentile kaj afable, se iu kuraĝas riveli al ŝi sian intencon, eĉ la ĝustan kaj sanktan de la edziĝo, Marcela ĵetas lin for de si, kvazaŭ per katapulto. Ŝi, tiel kondukante, pli damaĝas ol la pesto, ĉar ŝia belo kaj ĝentilo logas la koron de kiuj volas servi kaj ami ŝin, sed ŝia disdegno kaj rigoro kondukas ilin al la despero, tiom, ke ili ne scias kion diri, kaj nomas ŝin kruela kaj sendanka, inter aliaj similaj vortoj bone priskribantaj ŝian karakteron. Se vi restus ĉi tie kelkan tempon, vi vidus ĉi

montojn kaj valojn resoni per la lamentoj de la disdegnatoj ŝin sekvantaj. Ne tre diste de ni staras grupo de pli ol dudek altaj fagoj, kaj sur la glata ŝelo de ĉiu el ili aperas, gravurita, la nomo de Marcela kaj kelkfoje, super ĝi, la figuro de krono, kvazaŭ ŝia adoranto volus klare indiki, ke Marcela portas kaj meritas la kronon de la homa belo. Unuloke plendas paŝtisto, aliloke ĝemas alia; tie aŭdiĝas amaj kanzonoj, ĉi tie desperaj versoj. Unu sopiranto, kun larmoplenaj okuloj ĉiam apertaj, sidas la tutan nokton ĉe la piedo de kverko aŭ de granda roko, ĝis la suno trovas lin, la sekvantan matenon, absorbita en pensoj; alia, sen ĉesigi nek interrompi sian veadon, kuŝas sieste sur arda sablo en la posttagmezo de brula somero kaj sendas siajn plendojn al la kompatema ĉielo. Sed la bela Marcela senĝene kaj facile triumfas super unu, super la alia kaj super la ceteraj; dume, ni atendas en la vilaĝo, kiel finiĝos ŝia orgojlo, kaj kiam aperos la feliĉa viro kapabla dresi tiel sovaĝan naturon kaj ĝui tiel perfektan belon. Mi ĵus rakontis al vi la puran veron, do mi kredas, ke ankaŭ tio, kion diris nia juna paŝtisto pri la kaŭzo de la morto de Crisóstomo, estas vera. Mi konsilas vin, sinjoro, nepre ĉeesti morgaŭ lian enterigon. Ĝi estos vidinda, ĉar Crisóstomo havas multajn amikojn kaj krome, de ĉi tie ĝis la loko, kiun li elektis por sia tombo, distancas nur unu mejlon kaj duonon.

—Volonte mi ĉeestos —diris don Quijote—, kaj mi dankas vin, ĉar vi tre plezurigis min per tiel plaĉa rakonto.

—Ho! —respondis la paŝtisto—, mi ne konas eĉ la duonon de ĉio okazinta al la amantoj de Marcela, sed morgaŭ ni eble renkontos sur la vojo paŝtiston, kiu diros al ni la ceteron. Tamen en la nuna momento prefere iru dormi sub tegmento; alie la nokta roso povus difekti al vi la vundon, kvankam la unĝento, kiun oni ŝmiris al vi, estas tiel bona, ke nenion oni devas timi.

Sancho Panza, kiu sendadis al mil diabloj la senfinan historion de la paŝtisto, urĝis sian mastron eniri dormi en la kabanon de Pedro. Tion li faris kaj pasigis la pliparton de la nokto, pensante pri sia sinjorino Dulcinea, imite al la amantoj de Marcela. Sancho sin aranĝis inter Rocinante kaj sia azeno kaj dormis, ne kiel disdegnata amanto, sed kiel trabatita homo.

[71] Maĵoraj: bovoj, ĉevaloj, muloj kaj ceteraj de simila grando; minoraj: ŝafoj, kaproj kaj ceteraj de simila grando.

[72] Hispana vorto: skabio. Sara, la edzino de Abrahamo, estas konata ekzemplo de longviveco.

Ĉapitro 13

Kun la finiĝo de la rakonto pri la paŝtistino Marcela, kaj kun aliaj eventoj

Apenaŭ la aŭroro komencis montriĝi tra la balkonoj de Oriento, kvin el la ses kapristoj leviĝis, iris veki don Quijote, diris lin, ke, se li intencas ankoraŭ ĉeesti la faman enterigon de Crisóstomo, ili akompanos lin. Don Quijote deziris nenion alian, do leviĝis kaj ordonis Sanchon seli tuj la ĉevalon kaj la azenon. Tion faris la ŝildisto kun granda rapido, kaj same rapide ili ekiris sur la vojo. Marŝinte apenaŭ unu mejlon, ĉe la kruciĝo kun unu pado ili vidis veni ses paŝtistojn en nigraj jakoj kaj kun la kapoj kronitaj per girlandoj el cipreso kaj oleandro. Ĉiu portis en la mano dikan bastonon ileksan. Kun ili venis du surĉevalaj hidalgos en bonaj vojaĝo-kostumoj, akompanataj de tri piedirantaj servistoj. La du grupoj renkontiĝis, ĝentile salutis unu la alian, demandis sin reciproke, kien ili iras, kaj, informiĝinte, ke ĉiuj celas la lokon de la enterigo, denove plu iris jam en unu sola grupo.

Unu el la du rajdantoj, parolante kun sia kompano, diris:

—Ŝajnas, sinjoro Vivaldo, ke ni ne perdos nian tempon, ĉeestante ĉi rimarkindan ceremonion. Laŭ la strangaj rakontoj de la paŝtistoj rilate la mortinton kaj la kulpan knabinon, ni certe vidos neordinaran eventon.

—Tiel ŝajnas al mi —respondis Vivaldo—, kaj ne unu tagon, sed kvar mi perdus por ĝin spekti.

Don Quijote demandis al la hidalgo kion ili aŭdis pri Marcela kaj Crisóstomo. La rajdanto diris, ke en la mateniĝo ili renkontis la grupon de paŝtistoj, kies nigraj vestoj tiris ilian

atenton kaj igis lin demandi pri la kialo de la funebro; ke unu paŝtisto tion klarigis, menciante la belon kaj strangan konduton de paŝtistino nomata Marcela, la amon de ŝiaj sekvantoj kaj la morton de Crisóstomo, al kies enterigo ili sin direktas.

La rajdanto fine rakontis la samon, kion antaŭe diris Pedro al don Quijote, kaj ĉe la fino de ĉi konversacio, la nomata Vivaldo komencis alian, demandante al nia kavaliro, kio movas lin iri tiamaniere armita en tiel paca lando. Al tio li respondis:

—Mia profesio nek konsentas, nek permesas, ke mi iru alie. La lukson, la sinregalon kaj la ripozon oni inventis por la molaj korteganoj. Sed la klopodojn, la zorgojn kaj la armojn oni inventis kaj faris por la nomataj de la mondo vagantaj kavaliroj, al kies ordeno mi, kvankam tute senmerita, apartenas.

Aŭdinte tion, la aliaj konkludis, ke don Quijote frenezas. Sed, por pli certiĝi, kaj por eltrovi, kia estas lia frenezo, Vivaldo demandis kion ĝuste signifas vaganta kavaliro.

—Ĉu viaj moŝtoj ne legis —respondis don Quijote— la analojn kaj historiojn de Anglujo, kie troviĝas la famaj heroaĵoj de la reĝo Arturo, kastilie nomata Artús? Rilate lin ekzistas en la regno de Granda Britujo la olda kaj konata tradicio, ke li ne mortis, ke per magia arto oni turnis lin en korvon, kaj ke li revenos iam al sia regno kaj prenos denove la tronon kaj la sceptron. Tial neniu anglo mortigis ĝisnune eĉ unu solan korvon. Nu, en la epoko de ĉi bona reĝo fondiĝis la fama ordeno de la Kavaliroj de la Tablo Ronda, kaj tiam okazis, ĝuste kiel estas registrite, la am-afero de don Lanceloto kun la reĝino Ginevra, kies honorinda damo Quintaño estis ilia konfidenca perantino. De tio originis la romanco, tiel multe konata kaj kantata en Hispanujo:

—Eĉ ne foje kavaliron
tiel bele zorgis damoj
kiel lacan Lanceloton
alvenintan de Britlando,

»kun la historio dolĉa kaj ĉarma de liaj am-aferoj kaj prodaĵoj. Nu, de tiam la kavalira ordeno disvastiĝis tra multaj kaj diversaj partoj de la mondo. Famaj kaj konataj pro siaj faroj, servis en la ordeno la kuraĝa Amadís de Gaŭlio, kun siaj filoj kaj nevoj ĝis la kvina generacio, la sentima Felixmarte de Hirkanio, la neniam sufiĉe laŭdata Tirante el Blanco kaj la nevenkebla kaj aŭdaca kavaliro don Belianís de Grekujo, tiel proksima al nia epoko, ke ni preskaŭ vidas, alparolas kaj aŭdas lin en persono. Tio do estas la vaganta kavaliro kaj la ordeno kavalira, en kies vicoj, malgraŭ miaj pekoj, mi servas, same kiel servis la menciitaj kavaliroj. Tiel do, mi vagas tra dezertoj kaj solejoj serĉante aventurojn, ĉiam preta alfronti la plej grandajn danĝerojn per mia brako kaj mia persono por la bono de la feblaj kaj la senhelpaj.

Aŭdante tion, la kunvojaĝantoj plene konvinkiĝis pri la manko de saĝo de don Quijote kaj ekkonis la naturon de lia frenezo. Kaj ili sentis profundan miron, kiel ĉiuj homoj antaŭe konstatintaj por la unua fojo lian frenezon.

Vivaldo, viro sprita kaj ŝercema, por eviti la enuon de la vojaĝo dum la iomo da vojo ankoraŭ restanta ĝis la enteriga loko, decidis doni al don Quijote la ŝancon daŭrigi sian absurdan argumentadon. Li diris do:

—Ŝajnas al mi, sinjoro kavaliro vaganta, ke via moŝto surprenis unu el la plej striktaj profesioj de ĉi mondo. Mi kredas, ke eĉ ne la kartuziana vivo estas tiel rigora.

—Tiel rigora kiel la kavalira, eble —respondis don Quijote—. Sed, ke ĝi estas tiel necesa en la mondo, mi ne dubas

apenaŭ per harlarĝo. Ĉar verdire, tiel multe faras la soldato obeanta la komandon de sia kapitano, kiel la kapitano mem. Mi volas diri, ke la religiuloj pace kaj ripoze petas de la ĉielo la bonon por la tero, sed ni, soldatoj kaj kavaliroj, efektivigas iliajn petojn per la kuraĝo de nia brako kaj la rando de niaj glavoj, ne subtegmente sed sub la libera ĉielo, ricevante la netolereblan varmon de la suno en la somero kaj la mordan de la frostoj en la vintro. Ni estas do la ministroj de Dio en la mondo, la brakoj plenumantaj Lian justecon. Kaj, ĉar la aferojn rekte aŭ nerekte militajn oni ne povas plenumi sen ŝvito kaj troa penado, rezultas de tio, ke ni suferas sendube pli ol la homoj, kiuj en sekura paco kaj ripozo preĝas al Dio, ke Li helpu la misfortunajn. Mi ne volas diri, kaj la ideo eĉ ne venas al mi en la kapon, ke tiel indas la stato de la vaganta kavaliro, kiel la stato de la enklostra monaĥo, sed laŭ mia propra sperto nin sendube plagas pli da doloroj kaj turmentoj, pli da soifo kaj malsato, pli da mizero kaj ĉifonoj kaj pli da pedikoj. Oni ne povas dubi, ke la vagantaj kavaliroj de pasintaj epokoj eltenis multon da misfortuno en la daŭro de siaj vivoj. Se kelkaj el ili gajnis al si per la kuraĝo de sia brako la tronon de imperio, ili kare pagis ĝin per sango kaj ŝvito. Kaj ĉar ne mankis al ili la helpo de sorĉistoj kaj miraklofaraj saĝuloj, ili ne vidis sin fraŭditaj en siaj pretendoj nek trompitaĵoj en siaj espero.

—Mi same opinias —respondis Vivaldo—, sed speciale unu kutimo, inter multaj, de la vagantaj kavaliroj al mi ŝajnas kritikinda, nome, plenumonte kun evidenta danĝero al sia vivo grandan kaj riskoplenan faron, ili, en la momento de la atako, neniam rekomendas sin al la graco de Dio, kiel ĉiu kristano devas fari en tielaj situacioj. Anstataŭe ili mense konfidis sin al la protekto de sia damo kun tiel granda pieca fervoro, ke la damo ŝajnas esti ilia dio. Kaj tion mi opinias propra al paganoj.

—Sinjoro —respondis don Quijote—, ĝuste tiel oni devas fari, kaj la vaganta kavaliro alie kondukanta falus en infamion; ĉar estas konsekrita kutimo en la kavalirismo, ke la vaganta kavaliro, en la momento entrepreni grandan faron batalan, devas mense elvoki sian damon, milde kaj ame turni al ŝi la rigardon kaj peti de ŝi favoron kaj helpon en la riskoplena duelo. Kaj, eĉ se neniu lin aŭdas, li devas rekomendi sin al ŝi tutkore, fluŝtrante kelke da vortoj. En la historioj troviĝas multegaj tiaj ekzemploj, sed oni ne tiru el ili la konkludon, ke la kavaliroj neglektas turni sin al Dio; tempo por tio ili havas en la daŭro de la batalo.

—Tamen —diris Vivaldo— mi havas ankoraŭ unu dubon. Ofte mi legis, ke, por ekzemplo, du kavaliroj interŝanĝas pikajn vortojn ĝis fine ili kolerigas sin reciproke, kaj sen plie turnas siajn ĉevalojn por havigi al si manovran spacon, sin ĵetas plengalope unu kontraŭ la alian, kaj meze de la galopado ili sin rekomendas al siaj damoj. Kaj plej ofte el la kolizio rezultas, ke unu, trapikite de la lanco kontraŭula, falas teren super la pugo de la ĉevalo, dum la alia duelanto devas kroĉiĝi al la krinoj de sia rajdbesto por ne ruliĝi sur la grundo. Kaj mi ne komprenas, kiel la trapikito havus tempon por preĝi al Dio en la daŭro de tiel rapida ago. Ĉu ne pli bone, se, anstataŭ konsumi vortojn por rekomendi sin al sia damo, ilin oni uzus konforme kun la devo kaj la deco propraj al kristanoj? Des pli, ke, mi kredas, ne ĉiuj vagantaj kavaliroj havas damon, al kiu sin rekomendi, ĉar ne ĉiuj estas enamiĝintoj.

—Tio ne eblas —respondis don Quijote—. Ne eblas la ekzisto de kavaliro sen damo, ĉar la amo estas tiel propra kaj tiel natura al ili, kiel la steloj al la ĉielo. Tial ne troviĝas eĉ unu historio de kavaliro sen am-aferoj; alie temus, ne pri aŭtentika kavaliro, sed pri bastardo enirinta en la fortreson de la kavalirismo, ne tra la pordo, sed saltante la murojn, kiel ŝtelisto kaj enrompanto.

—Tamen —diris Vivaldo— ŝajnas al mi, ke, se mi ne mislegis, don Galaor, frato de la kuraĝa Amadís de Gaŭlio, neniam havis difinitan damon, al kiu sin rekomendi, kaj tio ne obstaklis, ke oni lin alte estimis, kaj efektive li estis tre fama kaj sentima kavaliro.

—Sinjoro, unu hirundo printempon ne alportas —diris don Quijote—. Krome, mi scias, ke don Galaor amis en sekreto. Cetere lia kutimo amindumi ĉiun damon plaĉan al li estis natura, do neregebla trajto de lia temperamento. Sed oni bone scias, ke li havis unu solan damon kiel mastrinon de sia koro, kaj al ŝi li sin rekomendis tre ofte, kaj ankaŭ tre sekrete, ĉar li ĉiam fieris, ke li estas tre diskreta kavaliro.

—Nu, se havi amatinon formas parton de la esenco de ĉiu kavaliro, mi pensas, ke ankaŭ via moŝto, pro via kavalira profesio, havas amatinon. Do se vi nur ne fieras je diskreteco, kiel Galaor, mi petegas vin, je la nomo de miaj akompanantoj kaj de mi mem, ke vi diru al ni nomon, landon, rangon kaj belon de via damo. Certe ŝin feliĉigus scii, ke oni diskonigas tra la mondo tion, ke ŝin amas kaj servas tiel granda kavaliro, kiel laŭŝajne vi estas.

Don Quijote profunde suspiris kaj respondis:

—Mi ne povas aserti, ĉu la dolĉa turmentantino mia volas, aŭ ne, ke la mondo sciu, ke mi ŝin servas. Mi scias nur (responde al via tiel ĝentila demando) ke ŝia nomo estas Dulcinea; ŝia lando El Toboso, iu vilaĝo de La Mancha; ŝia rango, almenaŭ princina, tial, ke ŝi reĝas super mi; ŝia belo, superhoma, ĉar en ŝi kolektiĝas la neeblaj kaj ĥimeraj atributoj de la beleco, kiajn la poetoj atribuas al siaj damoj: ŝiaj haroj estas oro; ŝia frunto, elizeaj kampoj; ŝiaj brovoj, ĉiel-arkoj; ŝiaj okuloj, sunoj; ŝiaj vangoj, rozoj; ŝiaj lipoj, koraloj; ŝiaj dentoj, perloj; ŝia kolo, alabastro; ŝia brusto, marmoro; ŝiaj manoj, eburo, kaj la partoj vualataj de la

pudoro kontraŭ la rigardo homa estas tielaj, kiel mi imagas kaj kredas, ke la prudento povas nur laŭdi ilin, ne kompari.

—Ni dezirus scii pri ŝiaj antaŭuloj kaj familio —diris Vivaldo.

—Ŝi ne apartenas al la antikvaj familioj Romanaj de Curcio, Cayo kaj Cipiono, nek al la modernaj de Colona kaj Ursino, nek al la katalunaj de Moncada kaj Requesens, nek al la valenciaj de Rebella kaj Vilanova, nek al la aragonaj de Palafox, Nuza, Rocaberti, Corella, Luna, Alagón, Urrea, Foz y Gurrea, nek al la kastiliaj de Cerda, Manrique, Mendoza kaj Guzmán, nek al la portugalaj de Alencastro, Pallas kaj Meneses. Sed ŝi apartenas al la familio El Toboso de La Mancha, kiu, kvankam de moderna deveno, povas tamen doni noblan originon al la plej gloraj familioj de la venontaj epokoj. Kaj oni ne kontraŭdiru min ĉi-rilate, se ne sub la kondiĉoj, kiujn Cervino skribis kaj metis ĉe la trofee kolektitaj armiloj de Roldán:^[73]

Ilin ne movi,
se vi ne povas
Roldanon provi.

—Kvankam mi devenas de la familio Cachopines de Laredo^[74] —respondis Vivaldo—, mi ne aŭdacus kompari ĝin kun tiu de El Toboso de La Mancha. Kvankam, verdire, ĝis nun mi ne aŭdis tian nomon.

—Ŝajnas nekredeble... —diris don Quijote.

La ceteraj kunvojaĝantoj aŭskultis kun granda atento ĉi konversacion, kaj eĉ la paŝtistoj mem konsciis la mankon de saĝo de don Quijote. Nur Sancho Panza, konante lin kaj kunvivante kun li de sia naskiĝo, opiniis vera kion lia mastro diris, kvankam li ne plene kredis tion pri la linda Dulcinea de

El Toboso, ĉar, loĝante tiel proksime al El Toboso, li neniam aŭdis pri tia nomo, nek pri tia princino.

Ĉe tio ili rimarkis, ke, de gorĝo inter du altaj montoj descendas proksimume dudek paŝtistoj en nigraj lanaj jakoj kaj kronitaj per girlandoj, kiujn, oni poste vidis, estis unuj cipresaj, kaj aliaj, taksusaj. Ses paŝtistoj portis ĉerkon kovritan per multaj, diversaj floroj kaj branĉoj. Tion vidante, diris unu el la kapristoj:

—La homoj tie portas la kadavron de Crisóstomo, kaj ĉe la piedo de la monto estas la loko, kie, laŭ liaj ordonoj, oni lin enterigos.

Do ili pli rapidis kaj alvenis ĝuste, kiam la paŝtistoj jam metis la ĉerkon sur la grundon, kaj kvar el ili komencis fari foson per akrapintaj pioĉoj flanke de dura roko.

La du grupoj ĝentile salutis unu la alian, kaj poste don Quijote kaj liaj akompanantoj observis la ĉerkon kaj vidis en ĝi, kovritan per floroj kaj en paŝtista kostumo, la kadavron de junulo proksimume tridekjara. Oni vidis ke, kvankam morta, li certe posedis dumvive agrablan mienon kaj vire belan korpon. Ĉirkaŭ li, en la ĉerko mem, kuŝis pluraj libroj kaj multaj paperoj fermitaj kaj nefermitaj. La rigardantoj, la fosantoj de la tombo kaj la ceteraj homoj gardis impresan silenton, ĝis unu el la kadavro-portintoj diris al alia:

—Pro tio, ke vi, Ambrosio, volas skrupule plenumi la testamenton de la mortinto, bonvolu observi, ĉu efektive ni staras sur la loko difinita de Crisóstomo.

—Ĝuste sur la loko —respondis Ambrosio—. Ĉi tie mia karmemora amiko ofte rakontis al mi la historion de sia misfortuno. Ĉi tie, li diris, li vidis por la unua fojo la mortodonan turmentantinon de la homa raso; ĉi tie li konfesis al ŝi por la unua fojo sian sinceran kaj honestan

amon, kaj ĉi tie Marcela, por la lasta fojo, disdegne ignoris lin, tiele, ke li metis finon al la tragedio de sia vivo mizera. Kaj je la memoro de tiom da misfortunoj, li volis, ke lia korpo kuŝu ĉi tie en la sino de la eterna forgeso.

Kaj turnante sin al don Quijote kaj liaj kompanoj, li daŭrigis:

—La viro, kies kadavron vi rigardas per kompataj okuloj, posedis animon, kien la ĉielo metis senfinan parton de siaj riĉoj. Tie kuŝas Crisóstomo, unika en talento, senkompara en ĝentilo, elstara en gracio, fenikso en amikeco, prodiga sen mezuro, gaja sen trivialo, fiero sen orgojlo kaj fine, unua en ĉia bono kaj same unua en ĉia misfortuno. Lian amon oni pagis per abomeno, kaj lian adoron per disdegno. Li suplikis bestion, penis moligi marmoron, persekutis venton, kriis en dezerto, servis sendankon kaj ricevis kiel rekompenco, en la mezaj jaroj de la vivo, la viziton de la morto pro la kulpo de la paŝtistino, kies figuron li deziris eternigi en la memoro de la homoj. Tion lastan pruvus la paperoj, kiujn vi rigardas, sed Crisóstomo ordonis min doni ilin al la flamoj, same kiel lian korpon al la tero.

—Vi estus, rilate la paperojn, eĉ pli rigora kaj kruela ol Crisóstomo mem —diris Vivaldo—. Ja nek justas nek decas plenumi ordonon kontraŭan al la racio. Cezaro Aŭgusto pruvis sian saĝon, kiam li ne permesis, ke oni plenumu la volon de la dia Mantuano.^[75] Do, sinjoro Ambrosio, donu la korpon de via amiko al la tero, sed ne lian verkon al la forgeso. Ne decas, ke vi neprudente plenumu kion li ĉagrenite ordonis. Male, se vi lasas la paperojn vivi, ankaŭ vivos por ĉiam la kruelo de Marcela kaj servos kiel instruo al la homoj de venontaj tempoj, ke ili sin gardu fali en similan abismon. Ni ĉiuj konas jam la historion de via enamiĝinta kaj senfortuna kompano, vian amikan rilaton kun li, la kaŭzon de lia morto kaj kion li testamentis ĉe la fino de sia vivo. Tiel lamentinda historio pruvas la kruelon de Marcela, la amon

de Crisóstomo, la sinceron de via amikeco kaj la sorton de la homoj spron-urĝe rajdantaj sur la vojo, kiun la delira amo montras al ili. Hieraŭ nokte ni sciiĝis pri la morto de Crisóstomo kaj pri la loko de lia enterigo, kaj, puŝitaj de scivolo kaj aflikto, ni deviis de nia vojo por okuli kion ni korprenate aŭskultis. Kiel kompenson do por ĉi aflikta sento nia kaj por nia deziro trovi rimedon al la tragedio, se tio estus ebla, ni petas vin, diskreta Ambrosio (mi petas almenaŭ je mia nomo), ke, anstataŭ destini la paperojn al la flamoj, vi permesu min preni kelkajn.

Kaj, sen atendi la respondon de la paŝtisto, li etendis la manon kaj prenis kelkaj paperojn el la pli proksimaj. Vidante tion, diris Ambrosio:

—Pro ĝentilo, sinjoro, mi konsentas, ke vi retenu kion vi jam prenis. Sed pensi, ke ŝparos ankaŭ la ceterajn, estus vane pensi.

Vivaldo deziris koni la enhavon de la paperoj, do li disfaldis unu kaj legis ties titolon: *Despera kanzono*. Ambrosio, aŭdinte tion, diris:

—Ĝi estas la lasta poezio de la povra Crisóstomo. Kaj por ke oni vidu, ĝis kia ekstremo lin puŝis lia misfortuno, bonvolu laŭte legi ĝin. Vi havas tempon, dum oni fosas la tombon.

—Tre volonte —diris Vivaldo. La aliaj ĉeestantoj, sentante la saman scivolon, sin aranĝis ĉirkaŭ li, kaj li legis kun klara voĉo la jenon:

[73] Roldán (Orlando, en la verko de Ariosto) liberigis el malamikaj manoj Cervinon, princon de Skotlando, kiu, kiel montron de dankemo, konservis liajn armiloj kaj metis ĉe ili

la jenan skribaĵon: «Armaturo d'Orlando Paladino. / Come volesse dir, nessun la muova / che estar non posa con Orlando a prova».

[74] En la epoko de Cervantes tia nomo estis sinonimo de parvenuo. Vivaldo ĝin uzas ironie por moketi la bombastan «El Toboso de La Mancha» elpensitan de don Quijote.

[75] Vergilio. Kiel sciante, li ordonis, ke, ĉe lia morto, oni bruligu lian *Eneado*, kion malhelpis liaj amikoj kaj la imperiestro Cezaro Aŭgusto mem.

Ĉapitro 14

Kie sidas la desperaj versoj de la mortinta paŝtisto,
kaj ankaŭ aliaj neatenditaj eventoj

Kanzono de Krisóstomo

Ĉar vi, kruela, volas, ke publike
la mondo sciu, kiom vi rigoras,
mi petos de la sino de l' infero
lamenton akran, kiu koropike
kapablu diri tion, ke doloras
kaj tristas mia brusto sen espero.
La voĉo mia vibros de sufero,
kiam la farojn viajn mi rakontos.
Ĝi sonos plene plena de turmento
kaj, kune kun la veoj de la sento,
amara sango el la koro fontos.
L' orelon bone streĉu por aŭskulti
ĉi tiun kanton brui kaj tumulti
el fundo de la brusto, kiu devas
iome faciliĝi de la pezo,
ĉar nuran spiton mi de ŝi ricevas.

La lupa hojlo, la leona bleko,
la siblo hida de serpento skvama,
de ia monstro la ulul' subita,
la grak' omena de kornika beko,
la bruo de tempesto oceana,
la muĝo de sovaĝa taŭro spita,
la kvero de turteto afliktita,
la huo de la strigo enviata^[76]
kaj la infera ploro de l' demonoj

miksiĝu tute, kaj, en ĝemaj tonoj,
iru el mia koro mizer-fata
konfuzi ĉies senson kaj racion
en strangan kaj ĥaosan emocion,
ĉar tia turmentado min voranta,
por esti rakontata, pli bezonas
la helpon de rimedo nova, hanta.

La trista eĥo de konfuz' tiela
ne flugos ĝis la sablaj Tajo-bordoj
nek ĝis Betisaj teroj fam-olivaj,^[77]
ĉar disvastiĝos ĉi dolor' kruela
per lango morta sed per vivaj vortoj
sur rokoj kaj sur kampoj senkultivaj,
sur la obskuraj valoj, sur nocivaj
kaj nudaj plaĝoj fridaj, neloĝataj,
kie neniam brilas sunradio,
kaj sur dezertaj sabloj de Libio
kun ega nombro de leonoj gvataj.
Kaj kvankam sur senhomaj, rokaj landoj
ne forte eĥos ĉi desperaj kantoj
pri la kruelo ŝia dura, drasta,
la povra fato mia ilin igos
konataj tra la tuta mondo vasta.

Disdegno pereigas. Nin vizitas
angore, bore, ŝire, la suspektoj.
Ĵaluz' detruas kun terura forto.
Kaj, forestante, oni ne evitas
sin ĵeti en kirlegon da konjektoj.
La dubo vundas per venena mordo
kaj nin deturnas de feliĉa sorto.
Mi tamen vivas —miraklo ja magia!—
kaj disdegnata, sola, mi ĵaluzas.
Suspektoj miaj prave ŝin akuzas,

kaj meze de dolor' seniluzia
eĉ ne espero febla min konsolas.
Do desperate tute, mi eĉ volas,
de nun rezigni ŝin kun koro firma.
Eĉ pli: mi ŝin rezignos poreterne,
ke povu min brakumi paco ŝirma.

Ĉu en la sama tempo oni povas
esperon havi kaj suferi timon,
se timo bedaŭrinde superregas?
Kiam ĵaluzo sin en nin enŝovas,
l' okulojn fermi vanas, se l' animon
kruele, vundofare ĝi skuegas.
Se en alies koro oni legas,
ke ĝi mensoga estas kaj perfida,
ĉu ne la pordon plene ni apertas
al ĉia suspektemo, ĉar ni certas,
ke vero turnas sin je falso hida?
Ĵaluzo, vi, kruela am-tirano,
al mi ponardon donu en la mano!
Fatalan ŝnuron donu vi, disdegno!
Sed ve! Ĉar mi ne povos ŝin memori,
timigas min la nigra mortoregno.

Sed mi pereu, kaj, ĉar mi desperas
pri l' vivo nuna kaj pri l' transa mondo,
mi volas stulte pensi laŭkutime,
ke amo belas, kiam ĝi sinceras,
ke ĝi, despota, estas liber-fonto,
ke pli ol korpe ravas ŝi anime,
ke prave ŝi min traktas malestime
kaj prave per ignoro reciprokas,
kaj ke sur mondo regas di' Amoro
per nur aflikto, tristo kaj doloro.
Kun tiaj pensoj mi l' eternon vokas,
kaj min helpante per fortika maŝo,

al morto hastos per rapida paŝo,
puŝite de la frida koro ŝia.
Kaj mia korpo kaj animo svenos
sen laŭraj kronoj kaj sen beno dia.

Rigoro via puŝas min, Marcela,
abrupte lasi ĉi ekziston dornan,
kaj jam kaj poreterne mi foriras.
Amare kaj kun koro ploro-ŝvela,
al via spito mian vivon mornan
oferi tre volonte mi deziras,
kaj se ĉe vi larmeto sin eltiras
—absurda penso— ĉe la morto mia,
prefere ne eligu ploran ĝemon,
kaj ne permesu al vi dolor-tremon,
vidante min senviva kaj glacia.
Kontraŭe, je tiela fato ridu.
Ke ĝin vi juĝas festo, oni vidu.
Sed ne necesas tia rekomendo,
ĉar mia morto donos al vi famon
kaj krome, certe, kaŭzon de kontento.

Jam tempo estas: el abismo venu
Tantalo kun malsato kaj soifo
apud Ticio kun la aglo vora.^[78]
Aperu Iksion', la radon trenu,
kaj same venu, kun la rok', Sizifo
kaj ankaŭ Danaidinar' labora.
Tortura tia, tuta kaj horora
en mia brusto nestu, plende flutu,
kaj se la eklezi' ne min absolvos,
kaj min en mortotukon ne envolvos,
humilan ĉanton oni nur tributu.
Kaj la pordist' infera trivizaĝa
kun monstregaro hida kaj sovaĝa

kunkantu tie, en la ĥoro sama,
ĉar pompon plian ne meritas
la pereinto pro sufero ama.

Ne plendu plu, kanzono sen espero,
lasinte min en foso de la tero.
La fino mia igas ŝin kontenta,
kaj tial do, apude de ĉi tombo
ne estu nun, kanzono, tristo-senta.

La kanzono de Crisóstomo plaĉis al la aŭskultantoj, sed Vivaldo diris, ke ĝi ne ŝajnas konformi al la laŭfame bona kaj virta Marcela, ĉar per siaj versoj Crisóstomo plende aludis al suspektoj, ĵaluzoj kaj forestoj damaĝantaj la reputacion de la junulino.

Sed Ambrosio, kiu konis la plej sekretajn pensojn de sia amiko, respondis:

—Por ke vi ne havu dubon, sinjoro, mi diru, ke, kiam la bedaŭrata Crisóstomo skribis la kanzonon, li jam de kelka tempo teniĝis memvole for de Marcela, kun la celo vidi, ĉu la foresto faros ankaŭ al li sian kutiman efikon. Kaj pro tio, ke al fora amanto ĉio estas motivo de zorgoj, kaj ĉiaj suspektoj lin hantas, ankaŭ Crisóstomon turmentis ĵaluzoj kaj suspektoj senbazaj. Marcela bonas, kiel la famo proklamas, kaj malgraŭ tio, ke ŝi estas kruela, iom orgojla kaj tre disdegnema, la envio mem nek povus, nek devus trovi en ŝi mankon.

—Sendube —diris Vivaldo. Kaj kiam li pretis legi alian el la paperoj savitaj el la kondamno al la fajro, li restis senmova, ĉar mirinda vizio (tio almenaŭ ŝajnis al li) subite aperis sur la supro de la roko, ĉe kies piedo oni fosadis la tombon. Temis pri Marcela, kies belo montriĝis eĉ pli impona ol asertis la onidiroj. La viroj neniam antaŭe ŝin vidintaj, rigardis ŝin

mute kaj admire, kaj la jam konantaj ŝin, ne malpli surpriziĝis. Sed apenaŭ Ambrosio ŝin rimarkis, li diris kun indigno:

—Ĉu vi venis vidi, ho sovaĝa bazilisko de ĉi montoj, ĉu la vundoj de la kompatinda, kies vivon falĉis via kruelo, verŝos sangon en via ĉeesto? Ĉu vi venis por triumfi antaŭ la kruelaj faroj de via koro; por kontempli de la alto, kiel alia Nero, la flamojn de brulanta Romo, aŭ por insolente treti ĉi mizeran kadavron, same kiel faris la sendanka filino de Tarkvinio^[79] kun la korpo de sia patro? Jam diru, kial vi venis, kion vi deziras. Mi scias tre bone, ke la volo de Crisóstomo ĉiam submetiĝis al vi, do mi zorgos, ke, eĉ post lia morto, ni, liaj amikoj, obeu vin.

—Ne, Ambrosio. Mi venis ne pro tiaj motivoj —respondis Marcela—, sed por defendi min, pruvante, kiel forte eraras la homoj, kiuj min akuzas pri siaj suferoj kaj pri la morto de Crisóstomo. Mi do petas ĉiun aŭskulti min atente. Mi ne bezonos longe paroli, por ke la prudentaj vidu la veron klara. Vi diras, ke la ĉielo faris min tiel bela, ke vi nepre devas ami min, kaj vi pretendas, ke mi, de mia flanko, amu vin, rekompencante tiel la amon vian. Mi scias per mia natura inteligento, ke ĉio bela amindas, sed mi ne komprenas, ke pro la sola fakto, ke ŝi inspiras amon, bela virino devas ami sian amanton; des malpli, ke povus okazi, ke la bel-amanto estus turpa, kaj, pro tio, ke ĉio turpa naŭzas, absurdus lia pretendo: «Ĉar vi belas, mi amas vin; sekve, vi amu min, eĉ se mi malbelas». Sed eĉ se li kaj ŝi egalus en belo, tio ne signifas, ke ili egalus ankaŭ en reciprokaj inklinoj, ĉar ne ĉiuj belaj inspiras amon; kelkaj nur donas plezuron al la okuloj, sed ne konkeras la koron. Se la belaj senescepte kapablus gajni al si ĉies volon, la homoj irus en konfuzo kaj perplekso, pasante senĉese de unu amo al alia kaj ne sciante, kie halti. La belaj estas nenombreblaj, do ankaŭ la deziroj estus tiaj. Krome mi aŭdis, ke la veran amon oni ne povas dividi, kaj ke

ĝin oni devas ne trudi, sed lasi, ke ĝi spontane aperu. Se, kiel mi kredas, en tio kuŝas la vero, kial vi volas, ke mi perforte submetu mian volon al la via, nur ĉar vi diras, ke vi amas min? Ni supozu, ke la ĉielo faris min turpa anstataŭ bela: ĉu mi devus plendi, se vi ne amus min? Krome pensu, ke mi ne elektis esti bela! Mian belon, kia ajn ĝi estas, donis al mi la ĉielo propravole; mi nek petis, nek elektis ĝin. Kaj same kiel oni ne devas akuzi vipuron pro ties venena mordo, ĉar la naturo faris la vipuron tia, tiel oni ne devas riproĉi min, ke mi belas, ĉar la belo de virta virino similas al dista brulo kaj al glavo akra, kies fajro kaj tranĉo ne vundas, se oni ne proksimas al ili. La ĉasto kaj la virtoj estas ornamoj de la animo, kaj sen ili la korpo, eĉ se bela, ne devus vidiĝi tia. Tiel do, se la ĉasto rangas inter la ĉefaj virtoj kaj donas dignon kaj belon al la animo kaj al la korpo, kial la virino, se amata, devas oferi sian ĉaston por kontentigi la deziron de kiu, obeante nur sian propran inklinon, ĉiakoste kaj ĉiaruze klopodas ŝin posedi?

»Mi naskiĝis libera kaj, por libere vivi, elektis la solecon de la kampoj. La arboj de la montoj min akompanas; la klara akvo de la rojoj servas al mi kiel spegulo, kaj al la arboj kaj akvo mi rivelas mian penson kaj belon. Se mia belo logas, miaj vortoj sobrigas. Laŭdire la deziroj nutras sin per espero, sed neniam mi donis eĉ iometon da ĝi al Crisóstomo aŭ al alia persono, do oni prefere diru, ke ne mia kruelo, sed lia obstino lin mortigis. Kaj se oni objetas, ke li havis honestan intencon, kaj sekve mi devus reciproki lin, mi respondas, ke, kiam li rivelis al mi la puron de sia intenco en la sama loko, kie nun oni fosas lian tombon, mi replikis, ke mi nur deziras vivi en konstanta soleco kaj aparteni al la ĉirkaŭanta naturo, kaj ke nur la tero ĝuos siatempe la restaĵojn de mia belo. Se, spite tion li volis persisti kontraŭ ĉia espero kaj veli kontraŭ la vento, oni ne miru, ke li dronis en la golfo de sia frenezo. Ĉar al mi ne plaĉas mensogi, mi donis al li nenian esperon. Kaj ĉar mi ne volas perforti mian propran senton kaj

konvinkon, mi ne cedis al liaj deziroj. Kvankam repuŝita, li persistis; kaj, kvankam mi ne abomenis lin, li desperis. Vidu do, ĉu oni pravas, dirante, ke mi kulpas pri liaj suferoj! Se mi trompos viron, li plendu. Se mi ne plenumos ian promesos al li, li desperu. Se mi vokos lin al mi, li konfidu; se mi akceptos lin, li fieru. Sed ne nomu min homicida nek kruela, se mi nek trompis, nek logis, nek vokis, nek akceptis lin. La ĉielo ne volis ankoraŭ, ke mi amu, do vanas pensi, ke mi cedos al la pretendoj de ajna viro. Ĉi ĝenerala averto servu kiel privata instruo al ĉiu amindumanto mia. Kaj oni komprenu, ke de nun, se iu mortos pro mi, li mortos, ne de ĵaluzo aŭ de disdegno, ĉar, kiu ne amas, tiu ne povas esti objekto de ĵaluzo, kaj krome, seniluziigi ne signifas disdegni. Se oni nomas min sovaĝa bazilisko, oni evitu min kiel ion nocan kaj malican. Ĉu mi estas sendanka? Oni min ne servu. Ĉu stranga? Oni min ignoru. Ĉu kruela? Oni min ne sekvu. Ĉar ĉi sovaĝa bazilisko sendanka, stranga, kaj kruela neniun serĉas, servas, konas aŭ sekvas. Se Crisóstomo pereis pro sia frenezo kaj senbrida pasio, kial oni riproĉu mian honestan konduton? Se mi konservas min ĉasta inter la arboj, kial la viro, kiu dezirus min ĉasta ankaŭ inter la homoj, volus preni la ĉaston de mi? Kiel vi scias, mi posedas propran riĉon kaj ne avidas la riĉon de aliaj. Mi ŝatas la liberon kaj havas nenian emon al submetiĝo. Mi neniun amas aŭ abomenas. Mi nek trompas unu, nek vokas alian, nek ŝercas kun kelkaj, nek flirtas kun la ceteraj. Honeste babilu kun la paŝtistinoj de la vilaĝoj kaj zorgi miajn kaprojn distras min. La ĉirkaŭaj montoj signas la limon de miaj deziroj, kaj, kiam ĉi lastaj vojaĝas, ili iras kontempli la belon de la ĉielo, pilgrimante al la unua loĝejo de la animo.

Kiam ŝi finis paroli, ŝi sin turnis kaj, sen atendi ajnan respondon, penetris en la denson de proksima arbaro, dum la personoj ŝin aŭdintaj, miris tiel pri ŝia prudento, kiel pri ŝia belo. Kelkaj, jam vunditaj de la potencaj sagoj de ŝiaj ravaj okuloj, ŝajnis pretaj sekvi ŝin, ignorante ŝian klaran kaj

ĵus formulitan averton. Don Quijote tion rimarkis, kaj pensante, ke alvenis la ĝusta momento kavaliri por la bono de senhelpa pucelo, metis la manon sur la tenilon de la glavo, kaj diris kun laŭta kaj klara voĉo:

—Neniu, kiun ajn rangon aŭ staton li havas, kuraĝu sekvi la belan Marcela, se li ne volas gajni al si la furiozan indignon mian. Ŝi montris per klaraj kaj sufiĉaj argumentoj, ke ŝi havas etan aŭ nenian kulpon rilate la morton de Crisóstomo, kaj ke ŝi absolute ne pensas cedi al la deziroj de siaj amantoj. Tial do, anstataŭ persekuti kaj ĝeni ŝin, justas, ke ĉiuj bonaj homoj ŝin honoru kaj estimu, ĉar ŝi pruvis, ke en la mondo ŝi estas la sola virino vivanta kun tiel puraj intencoj.

Aŭ pro la minacoj de don Quijote, aŭ pro tio, ke Ambrosio petis, ke oni plenumu ĝis la fino la devon ŝuldatan al lia bona amika, la paŝtistoj ne moviĝis de la loko, ĝis oni tute fosis la tombon, bruligis la paperojn kaj metis la kadavron en la kavon inter la larmoj de la ĉeestantoj. Oni fermis la tombon per granda roko, kaj Ambrosio diris, ke ĝi provizore taŭgos, ĝis oni ĝin anstataŭigos per steleo, kiun li pensis mendi kun la jena epitafo:

Kuŝas tie ĉi paŝtisto
povra, frosta kaj mizera,
ĉar disdegno tre kruela
lin repuŝis kun insisto.
Lin faligis la senkora
kaj sendanka belulino,
kies ĉarmo kaj fascino
faras amon pli rigora.

Poste la paŝtistoj ŝutis sur la tombon multe da floroj kaj branĉoj, kondolencis lian amikon Ambrosio kaj adiaŭis lin. La samon faris Vivaldo kaj lia kompano, kaj don Quijote adiaŭis

siajn gastigintojn kaj la hidalgojn. Ĉi lastaj insistis, ke li ilin akompanu al Sevilla, ĉar ĝuste tie, en ĉiu strato kaj angulo troveblas pi da aventuroj ol ie ajn en la mondo. Don Quijote dankis ilin por la informo kaj por ilia evidenta deziro komplezi lin, kaj diris, ke li nek volas, nek devas iri al Sevilla, sen antaŭe elpurigi la ĉirkaŭan montaron je la perversaj rabistoj ŝajne tie svarmantaj.

Ĉe tiel laŭdinda intenco, la hidalgoj ne plu insitis al li, refoje lin adiaŭis, sekvis sian vojon, kaj en ties tuta longo ne mankis al ili temoj de konversacio, ĉu pri la historio de Marcela kaj Crisóstomo, ĉu pri la frenezaĵoj de don Quijote. Nia kavaliro decidis serĉi la paŝtistinon Marcela por proponi siajn servojn al ŝi. Sed ne okazis, kiel li pensis, kaj pri tio oni rakontas en ĉi vera historio, kies dua parto finiĝas ĉi tie.^[80]

[76] La strigon oni uzis kiel logobirdon, kaj la simplaj homoj kredis, ke la birdoj flugas al ĝi pro envio al ĝiaj grandaj, brilaj okuloj, celante ilin elpiki.

[77] «Betis», hispane, antikva nomo de la rivero Guadalquivir.

[78] La koloso Ticio sidis en la infero, ĉar li volis perforti Letonan, patrinon de Apolono kaj Diana. Aglo senĉese pikis lian sinon.

[79] Cervantes faras eraran aludon. Laŭ la historio, Tulia direktis sian ĉaron sur la kadavron de sia patro, Servio Tulio, kiun oni murdis, por ke ŝia edzo, Tarkvinio, reĝu.

[80] Cervantes ne difinis al si, ĉe la komenco, la longon kaj strukturon de *Don Quijote*.

Ĉapitro 15

Kie oni sciigas pri la misaventuro de don Quijote en lia renkonto kun malicaj janguanoj^[81]

Rakontas la saĝa Cide Hamete Benengeli, ke tuj kiam don Quijote diris adiaŭ al siaj gastigintoj kaj al la ceteraj spektintoj de la enterigo de la paŝtisto Crisóstomo, li kaj Sancho Panza rajdis en la saman arbaron, en kies denson ili vidis Marcelan penetri; kaj ke, vane serĉinte ŝin dum pli ol du horoj ĉie inter la arboj, ili alvenis al valetu riĉa je freŝa herbo, kie fluis tiel paca kaj friska roĵo, ke ĝi invitis, eĉ persvadis, pasigi tie la horojn de la posttagmezo, kiu jam komencis tre varmi.

Deseliĝis don Quijote kaj la ŝildisto, kaj, lasinte la azenon kaj la ĉevalon laŭplaĉe paŝtiĝi meze de la abunda herbo, fosis en la dusako kaj konsumis kion ĝi entenis sen ia ceremonio kaj en paco kaj kontento. Sancho ne zorgis pli frue ligi la piedojn de Rocinante, ĉar li opiniis ĝin tiel kvietita kaj tiel ete amorema, ke li certis, ke ĉiuj ĉevalinoj de la herbejoj de Córdoba ne sukcesus stimuli ĝin al ia nedecaĵo. Sed laŭ la volo de la sorto — kaj ankaŭ de la diablo, kiu ne ĉiam dormas — en la sama valetu paŝtiĝis gregu da galegaj ĉevalinoj, kies pelistoj-janguanoj kutimas siesti tie, kie ekzistas akvo kaj herbo por la brutoj; kaj la loko elektita de don Quijote plej konformis al ilia gusto. Okazis do, ke en Rocinante vekigis la deziru flirti kun la sinjorinoj ĉevalinoj, ĉar, flarsentinte ilin, ĝi forgesis sian ordinaran naturon kaj flegman paŝon kaj, sen peti la permeson de la mastro, trotante pli vigle ol kutime, iris komuniki al la ĉevalinoj sian ideon. Sed ili, laŭŝajne pli inklinaj manĝi ol frivoli, akceptis la ĉevalon per hufoj kaj dentoj, tiele, ke ili baldaŭ rompis ĝian ventrobendon kaj lasis

ĝin sen selo kaj tute nuda. Sed certe plej doloris la ĉevalon, ke la pelistoj, observante kiel ĝi impertinentas al la ĉevalinoj, alkuris kun dikaj bastonoj, kaj tiom da vergoj ricevis Rocinante, ke en priplorinda stato ĝi falis sur la grundon. Ĉe tio don Quijote kaj Sancho, kiuj vidis la batadon, alvenis anhelante helpi la ĉevalon.

—Kiom mi rimarkas, amiko Sancho —diris don Quijote—, ĉi tio estas ne kavaliroj, sed homoj kanajlaj kaj senrangaj. Tion mi diras, por ke vi sciu, ke vi povas helpi min venĝi la ofendon faritan al Rocinante antaŭ niaj propraj okuloj.

—Kiel, je la diablo, ni venĝos? —respondis Sancho—. Ili estas dudek kaj kelkaj, kaj ni, nur du; eĉ ne tiom, eble nur unu kaj duono.

—Mi sola valoras centon da ili —diris don Quijote, kaj senplie elingis la glavon kaj sin ĵetis kontraŭ la janguanojn, kaj Sancho Panza, inspirita kaj spronita de la ekzemplo de sia mastro, faris la samon. Per la unua hako don Quijote fendis la ledan bluzon de janguano kaj grandan parton de lia dorso. Sed liaj kompanoj, vidante, ke ilin mistraktas du solaj viroj, prenis siajn bastonegojn, ĉirkaŭis la paron kaj kun granda fervoro kaj entuziasmo komencis ellasi sur ilin pluvon da batoj. Verdire jam la dua bato renversis Sanchon sur la teron, kaj la samo okazis al don Quijote malgraŭ lia kuraĝo kaj lerto. Laŭ la volo de la Fato li falis ĉe la piedoj de la ankoraŭ kuŝanta Rocinante, kio pruvas, kiel furioze pistas bastonoj svingataj de la manoj de koleraj kampuloj. Kiam la janguanoj vidis la damaĝon, kiun ili faris, ili plej rapide ŝarĝis siajn brutojn, kaj sekvis sian vojon lasinte la du aventuristojn en aĉan staton kaj en ankoraŭ pli aĉan humoron.

Sancho Panza komencis ĝemi la unua, kaj, vidante sin apud sia mastro, diris kun voĉo plenda kaj trema:

—Sinjoro don Quijote... Oj, sinjoro don Quijote!

—Kion vi volas, frato Sancho? —respondis la kavaliro kun la sama tono fragila kaj vea.

—Mi volas, ke via moŝto donu al mi du glutojn de la trinkaĵo de la fiero Blas, se eble vi havas ĝin ĉemane; povas esti, ki ĝi bonas tiel al la rompitaĵoj, kiel al la vundoj.

—Ve al mi! —respondis don Quijote—. Nenio mankus, se mi ĝin havus! Sed mi ĵuras al vi, Sancho, je mia vorto de vaganta kavaliro, ke antaŭ ol pasos du tagoj ni disponos la balzamon, se la sorto ne ordonos alion, kaj se mi povos movi la manojn.

—Kaj kiom de tempo pasos ankoraŭ, ĝis ni povos movi la piedojn? —demandis Sancho.

—Rilate min, mi ne povas kalkuli, ĝis kiam mi kuŝos ĉi tie — respondis la tradraŝita don Quijote—. Sed nur mi kulpas pri ĉio, ĉar mi ne devis uzi la glavon kontraŭ homoj sen kavalira rango. Mi kredas, ke la dio de la bataloj permesis, ke oni min punu pro tio, ke mi ne observis la regulojn de la kavalirismo. Do, frato Sancho, konvenas al nia komuna bono, ke vi atente aŭskultu la jenan averton: kiam vi vidos, ke kanajlaro tia nin ofendos, ne atendu, ĝis mi eliros la glavon kontraŭ ilin, ĉar tion mi tute ne faros. Nur vi punos ilin laŭplaĉe per via propra glavo, kaj, se ajna kavaliro helpas aŭ defendos ilin, tiam mi protektos vin, ilin atakante kun mia tuta potenco. Vi jam havis mil signojn kaj pruvojn, pri kiel grandas la kuraĝo de ĉi forta brako mia.

Tiel fierigis la povran kavaliron lia venko super la vasko. Sed Sancho ne trovis tre agrabla la averton de sia mastro, kaj ne povis ne respondi:

—Sinjoro, mi estas pacema kaj kvietas, ĉar mi havas, por vivteni kaj flegi, edzinon kaj filojn. Do, via moŝto ricevu kiel avizon (ne kiel altrudon, kompreneble), ke nenial mi uzos la glavon kontraŭ kampulo aŭ kontraŭ kavaliro, kaj ke, mi ĵuras je Dio, mi pardonas de nun la ofendojn, kiujn mi ricevis aŭ ricevos de riĉaj aŭ mizeraj, de potencaj aŭ humilaj, de nobelaj aŭ servutaj, sen escepti ajnan staton aŭ rangon.

Tion aŭdinte, respondis lia mastro:

—Se mi havas sufiĉan spiron por facile paroli, kaj se la doloro de ĉi ripo mildiĝus iomete, mi dezirus komprenigi al vi, kiel grave vi eraras. Bone atentu, vi, kot-anima: se la vento de la Fortuno, ĝis nun tiel kontraŭa, turniĝus, kaj ŝvelus la velo de nia espero, kaj ni albordiĝus sekure kaj rekte al unu el la insuloj, kies regadon mi al vi promesis, kio okazus al vi, se mi ĝin konkerus kaj igus vin ĝia mastro? Nu, ĉio fiaskus, ĉar vi ne estas kavaliro, nek deziras kavaliro, kaj mankas al vi la kuraĝo, eĉ la intenco, venĝi ofendojn kaj defendi vian aŭtoritaton. Sciu, ke en la regnoj kaj la provincoj nove konkeritaj, la spirito de ties civitanoj ne tiel kvietas, nek inklinas al la nova mastro, ĝis la ekstremo, ke oni pensu, ke ili ne klopodos denove ŝanĝi la staton de la aferoj, aŭ, kiel oni diras, provi la sorton. Tiel do, necesas, ke la nova mastro havu inteligenton por regi kaj kuraĝon por ataki kaj sin defendi en ĉiu okazo.

—En la nuna mi dezirus havi tian kuraĝon kaj inteligenton — diris Sancho—. Sed mi ĵuras, je mia vorto de kompatindulo, ke mi pli bezonas plastron ol konversacion. Nu, via moŝto provu stariĝi, kaj ni helpos la ĉevalon, kvankam ĝi ne meritas tion, ĉar ĝi estas la ĉefa kaŭzo de la densa pluvo da batoj nin trafinta. Nenion tian mi imagis pri Rocinante, ĉar mi opiniis ĝin tiel ĉasta ulo kiel mi mem. Nu, oni prave diras, ke necesas multe da tempo por ĝisfunde koni la homojn, kaj ke en ĉi mondo nenio certa ekzistas. Kiu povus imagi, post ol

via moŝto ellasis tiel fortajn hakojn al la povra kavaliro vaska, ke ŝtormego da vergoj venus tuj sekve krevi sur nin?

—Vi, Sancho, certe havas dorson harditan kontraŭ tiaj tempestoj. Sed mia haŭto, vartita inter plej delikataj toloj el Holando, devas senti ankoraŭ pli ol vi la doloron de ĉi misfortuno. Kaj nur pro tio, ke mi imagas (verdire, certas), ke tielaj ĝenoj nedisigeble apartenas al la kavalira profesio, mi ne lasas min pereii de ĉagreno nun kaj ĉi tie.

Al tio respondis la ŝildisto:

—Sinjoro, se la kavalirismo donas tian rikolton de misfortunoj, via moŝto diru, ĉu ili okazas ofte aŭ en difinitaj periodoj. Ŝajnas al mi, ke post du rikoltoj de tiu speco, ni povos apenaŭ kolekti la trian, se Dio ne helpas nin kun sia senlima mizerikordo.

—Sciu, amiko Sancho, ke la vivo de la vagantaj kavaliroj estas objekto de mil danĝeroj kaj sortobatoj. Tamen ili havas almenaŭ la eblon fariĝi reĝoj kaj imperiestroj, kiel montriĝas en la kazoj de multaj kaj diversaj kavaliroj, kies historion mi bone konas. Mi povus rakonti al vi, se la doloro tion allasus, pri kavaliroj sin levintaj nur per la kuraĝo de sia brako ĝis la rangoj antaŭe menciitaj, kvankam antaŭe kaj poste ili devis pasi tra diversaj plagoj kaj misfortunoj. Por ekzemplo, la kuraĝa Amadís de Gaŭlio falis iam en la manojn de sia ĝismorta malamiko, la sorĉisto Arcalaus, kaj ne ekzistas dubo, ke ĉi lasta ligis lin al kolono de korto kaj donis al li pli ol ducent frapojn per la rimenoj de lia ĉevalo. Unu aŭtoro anonima, sed tre fidinda, diras, ke la Kavaliro de la Suno, en certa kastelo pasis sur klapopordon, falis tra ĝi, kaj tuj poste troviĝis kun la manoj kaj piedoj ligitaj en subtera kaverno, kie oni aplikis al li klisteron el neĝo-akvo kaj sablo; kaj la povra kavaliro ne suferis pli gravajn sekvojn, ĉar ia sorĉisto, granda amiko lia, lin helpis en tiel bedaŭrinda okazo. Tiel do,

mi povas permesi al mi suferi kiel tiuj bravaj kavaliroj, des pli, ke ili eltenis pli grandajn humiligojn ol ni eltenas. Sciu, Sancho, ke la vundoj faritaj per iloj okaze troviĝantaj en la mano kaŭzas nenian infamion; tion klare esprimas la leĝoj de la duelo. Sekve, se, por ekzemplo, ŝuisto batas alian personon per la boto-ŝtupo, kiun li okaze tenas en la mano, oni devas diri, ke, kvankam la ŝtupo estas ligna, la viktimo ricevas nenian batadon. Mi diras tion, por ke vi ne pensu, ke ĉar en la fino de la batalo ni vidas nin kuŝantaj kaj plenaj de kontuzoj, nin trafis infamio. Oni pistis nin, ne per armiloj, sed per bastonoj, kaj, kiom mi memoras, neniu uzis glavon aŭ ponardon.

—Mi ne havis tempon por observi tiajn detalojn —respondis Sancho— ĉar, apenaŭ mi ektiris la glavon, ili tiel karesis al mi la dorson per la bastonoj, ke ili elbatis la vidon el miaj okuloj kaj la forton el miaj kruroj kaj sternis min sur la saman lokon, kie nun mi kuŝas, kaj kie mi tute ne zorgas, ĉu la vergoj ofendas aŭ ne ofendas, kvankam la doloraj frapoj tiel fiksiĝos en mia memoro, kiel en mia dorso.

—Tamen sciu, frato Sancho, ke la tempo viŝas ĉian memoron kaj la morto dispelas tute la doloron.

—Kaj kio pli mizera ekzistas ol misfortuno, kiun nur la tempo povas viŝi kaj la morto dispeli? —respondis Sancho—. Se nia misfortuno estis tia, ke ĝi solviĝus per du kataplasmoj, ĉio irus ne tute mave. Sed mi komencas pensi, ke ĉiuj plastroj de unu hospitalo ne sufiĉus al ni en la nuna okazo.

—Nu, bone, el via feblo eltiru forton, Sancho, kaj mi faros la samon —diris don Quijote—. Kaj ni vidu, kiel fartas Rocinante, ĉar, ŝajnas, ĝi ricevis ne la pli etan parton de ĉi misaventuro.

—Ne strange —respondis Sancho—. Ankaŭ Rocinante estas vaganta kavaliro. Sed mi miras, ke mia azeno eltiris sin sendifekta kaj kompleta, dum oni rompis al ni ĉiun ripon.

—La Fortuno ĉiam lasas aperta unu pardonon tra la misaventuroj, por allasi rimedon kontraŭ ili. Mi tion diras, ĉar ĉi azeneto povos nun servi, anstataŭ Rocinante, por porti min ĝis ajna kastelo, kie oni kuracos al mi la vundojn. Des pli, ke mi ne juĝas senhoriga tian rajdbeston. Mi memoras, ke mi legis, ke la bona kaj olda Sileno, gubernisto kaj pedagogo de la gaja dio de la rido, eniris en la urbon de la cent pordoj plej ĝoje rajdante sur tre bela azeno.

—Sendube li rajdis, kiel via moŝto diris —respondis Sancho —, sed unu afero estas sidi rajdiste, kaj alia kuŝi krucita sur la selo kiel sako de ekskremento.

—La vundoj ricevataj en batalo donas honoron, ne malgloron, amiko Panza, do ne repliku kaj, kiel dirite, stariĝu laŭpove kaj metu min sur la azenon, kiel ajn vi volos. Ni devas foriri antaŭ ol la nokto atingos nin en ĉi loko tiel senhoma.

—Sed mi aŭdis vian moŝton diri, ke estas afero tre kavalira dormi la pli grandan parton de la jaro en solejoj kaj dezertoj, kaj ke la kavaliroj konsideras tion vera feliĉo.

—Tio okazas, kiam ili ne povas fari alion, aŭ kiam ili enamiĝas. Kaj efektive, oni scias pri kavaliroj, kiu sidadis sur rokoj kaj tie sin elmetis du jarojn al la suno, al la ombro kaj al la rigoroj de la vetero. Kaj dume iliaj damoj konis nenion pri la afero. Unu tia kavaliro estis Amadís, kiam sub la nomo Beltenebros^[82] retiriĝis a la Mizera Roko kaj pasigis tie, mi ne scias ĉu ok jarojn aŭ ok monatojn, mi ne ĝuste memoras. Sufiĉas diri, ke li sidis sur la roko, pentofarante, ĉar sinjorino Oriana kaŭzis al li, mi ne scias kian ĉagrenon. Sed ni jam

lasu la rakontojn, Sancho, kaj vi moviĝu, antaŭ ol okazos al la azeno, same kiel okazis al Rocinante.

—Je la diablo, tio estus la neplio —diris Sancho.

Kaj elpuŝante tridek veojn, sesdek suspirojn kaj cent dudek sakrojn kaj insultojn kontraŭ tiu, kiu metis lin en tian staton, li komencis stariĝi, sed haltis, kvazaŭ paralizita, ĉe la mezo de siaj movoj, kaj fine staris duonkurba, kiel turka arko, kaj nekapabla tute sin rektigi. Tamen, penante kaj suferante li selis la azenon, kiu jam antaŭe profitis same de la troa libereco de tiu tago, por iom vagabondi, poste li tir-levis Rocinante kaj, se la ĉevalo posedus langon por plendi, certe nek don Quijote nek lia ŝildisto superus ĝin en tio.

Fine Sancho metis la kavaliron sur la azenon, ligis al ties vosto la ĉevalon, gvidis sian bruton per la kondukiloj kaj sin turnis a la direkto kie, li pensis, troviĝis la ĉefvojo.

Li iris apenaŭ du mejlojn, kiam la Fortuno, kondukante ilin de bono al plibono,^[83] montris al li vojon, ĉe kies flanko Sancho rimarkis gastejon. Ĉagreniĝis la ŝildisto pro la ĝojo de don Quijote, kiu kredis la konstruaĵon kastelo. Sancho rebatis, ke temas pri gastejo, kaj lia mastro insistis, ke li vidas nur kastelon. Ilia diskutado tiom daŭris, ke, sen fini ĝin, ili alvenis al la domo, kaj Sancho senplie eniris tien kun sia tuta karavano.

[81] Naskiĝintoj aŭ loĝantoj en Yanguas (elparolu «jangŭas»), nomo de du hispanaj vilaĝoj.

[82] Resuma formo de «bela» kaj «tenebra».

[83] Ironio de Cervantes. Fakte ili iris de mavo en pli mavon,
kio vidiĝas en la sekvanta ĉapitro.

Ĉapitro 16

Kio okazis al la inĝenia hidalgo en la gastejo, kiun li imagis kastelo

La gastejestro, rimarkante, ke don Quijote kuŝas transverse, sur la azeno, demandis al Sancho, kian damaĝon li havas. La ŝildisto respondis, ke temas pri vere nenio, ke la sinjoro ruliĝis de la supro de roko, kaj ke liaj ripoj iom kontuziĝis dum la falo. La edzino de la gastejestro ne havis la karakteron, kiun ordinare posedas tiaj virinoj, kontraŭe, ŝi estis bonkora kaj kompatema ĉe la misfortuno de la proksimuloj. Do, ŝi tuj pretis kuraci nian kavaliron kaj igis, ke ŝia filino, juna kaj tre bela pucelo, asistu ŝin. En la gastejo servis ankaŭ asturia virino kun larĝa vizaĝo, dika nuko, plata nazo, unu okulo blinda, kaj la alia ne tre sana. Verdire la svelto de ŝia korpo kompensis ŝiajn mankojn: de la piedoj ĝis la kapo ŝi staturis eĉ ne sep spanojn, kaj la dorso, iom ĝiba, igis ŝin rigardi la grundon, pli ol ŝi deziris. Tiel ĉarma servistino helpis la pucelon aranĝi mizeran liton por don Quijote en mansardaĉo montranta evidentajn signojn, ke ĝin oni uzis kiel pajlejon dum multaj jaroj. En la sama mansardo gastis ankaŭ mulisto, kies lito, staranta iom preter la kuŝejo de don Quijote kaj konsistanta el seloj kaj plejdoj de liaj muloj, estis multe pli bona ol la hidalgo, kiun formis kvar aspraj tabuloj sur du stabloj neegalaj; unu matraco minca kiel plumono kaj plena de tuberoj tiel duraj, ke subpalpe oni kredus ilin ŝtonaj, se oni ne vidus ilin lanaj tra diversaj ŝiraĵoj; du tukoj tiel supraj kaj delikataj kiel ledo de ŝildo; kaj unu kovrilo, kies ĉiun fadenon oni povus facile kalkuli. En tiel abomeninda lito kuŝiĝis don Quijote, kaj poste la gastejestrino kaj ŝia filino plastris lin de la kapo ĝis la piedoj, dum Maritornes (tiel nomiĝis la asturianino) lumigis la

scenon per lampo. Plastrante lin, la gastejestrino rimarkis multe da bluaĵoj sur diversaj partoj de lia korpo, kaj diris, ke laŭ tio li certe suferis ne falon, sed batadon.

—Batadon, ne —diris Sancho—. Okazis, ke la roko havis multajn eĝojn kaj ĝibojn, kaj ĉiu lasis sian spuron. Kaj bonvolu, sinjorino, rezervi kelkon da plastroj. Ili estos bonvenaj, ĉar ankaŭ al mi doloras iom la renoj.

—Ĉu ankaŭ vi falis? —demandis la gastejestro.

—Ne —respondis Sancho—. Sed mi tiel impresiĝis, kiam mi vidis mian mastron fali, ke mia tuto korpo doloras, kvazaŭ batita de mil vergoj.

—Tio eblas —komentis la pucelo—, ĉar mi ofte sonĝas, ke mi falas de la supro de turo kaj neniam atingas la grundon; kaj, kiam mi vekiĝas, mi trovas min tiel muelita kaj laca, kvazaŭ mi estus efektive falinta.

—Sed jen la afero —respondis Sancho Panza—. Songante nenion, ĉar mi estis eĉ pli vekita ol nun, mi vidis min preskaŭ tiel kontuzita kiel mia sinjoro don Quijote.

—Kiel nomiĝas ĉi kavaliro? —demandis la asturia Maritornes.

—Don Quijote de La Mancha —respondis Sancho—, unu el la plej bonaj kaj bravaj kavaliroj aventuristoj konataj.

—Kio estas kavaliro aventuristo? —demandis la servistino.

—Tiel ĵuse vi venis en la mondon, ke vi ne scias tion? —diris Sancho—. Sciu do, estimata, ke kavaliro aventuristo estas homo preskaŭ en la sama momento trabatita kaj reĝanta. Jen li estas la plej mizera kaj senfortuna en la mondo, jen la sekvantan tagon li disponas du tri regnojn por donaci ilin al sia ŝildisto.

—Kaj, se vi servas tiel grandan sinjoron —diris la gastejestrino— kial vi, laŭ via ŝajno, ne havas almenaŭ la kronon de duko?

—Estas ankoraŭ frue —respondis Sancho—. Apenaŭ de unu monato ni serĉas aventurojn, kaj ĝis nun ni ne renkontis ilin, eble, ĉar oni serĉas ion, kaj trovas alion. Tamen se mia sinjoro don Quijote resaniĝos de la vundoj, nu, de la falo, mi ne ŝanĝos mian esperon por la plej alta nobel-titolo.

Don Quijote aŭskultis tre atente ĉi konversacion, movis sin, kiel li povis, de kuŝa al sida teniĝo, prenis la manon de la gastejestrino kaj diris:

—Kredu, rava sinjorino, ke vi povas nomi vin feliĉa, tial, ke mi en persono gastas en ĉi kastelo via. Mi ne devas informi vin, kia mi estas, ĉar laŭdire, oni sennobliĝas, sin laŭdante. Sed mia ŝildisto diros pri mi. Mi aldonu nur, ke mi gardos eterne en la memoro la servon, kiun vi ĵus faris al mi, ke mi povu danki vin dum mia tuta vivo. Kaj se la ĉielo ne tenus min sklave submetita al la leĝoj de la amo kaj al la okuloj de la sendanka ĉarmulino, kies nomon mi apenaŭ flustras tradente, tiam la rigardoj de ĉi rava pucelo estus la solaj mastroj de mia libereco.

La gastejestrino, ŝia filino kaj la bona Maritornes gapadis ĉe la esprimoj de la vaganta kavaliro kaj komprenis nenion, kvazaŭ ili aŭskultus la grekan; sed ili bone konsciis, ke liaj vortoj temas pri dankoj kaj komplimentoj; kaj, ĉar ili neniam aŭdis tian lingvaĵon, ili miris kaj admiris lin kiel personon de nekonata speco. Fine en taverna lingvo ili dankis lin pro ties ĝentilo kaj foriris, kaj Maritornes plastris la ŝildiston, kiu tion bezonis ne malpli ol don Quijote.

Nu, la mulisto jam antaŭe interkonsentis kun Maritornes pasigi kune la nokton en amoraj ludoj, kaj ŝi promesis, ke,

kiam la gastoj kaj ŝiaj gemastroj dormos, ŝi iros al li kaj kontentigos lin laŭ lia deziro. Kaj oni rakontas pri ĉi bona virino, ke ŝi plenumis ĉiam kion ŝi promesis, eĉ se la promeson ŝi farus en la denso de arbaro kaj sen atestantoj, ĉar ŝi fanfaronadis, ke ŝi devenas de nobela familio, kaj ke ŝi ne sentas sin degradita servante en gastejo, konsiderante ke al tio ŝin puŝis nur la misfortuno kaj diversaj sortobatoj.

La dura, streta, mizera kaj nefidinda lito de don Quijote staris unua meze de tiu speco de stalo, tra kies tegmentaj fendoj penetris la lumo de la steloj; apude Sancho jam aranĝis al si sian kuŝejon konsistantan el unu vimena mato kaj unu plejdo, kiu, pli ol lana, ŝajnis drelika kaj vidiĝis tute eluzita. Laste staris la mulista lito, farita, kiel oni jam diris, per la seloj kaj cetera garno de la du plej bonaj muloj el la dek du brilaj, grasaj kaj superbaj, kiujn li havis. La aŭtoro de ĉi historio diras, ke temis pri unu el la riĉaj mulistoj de Arévalo, kaj, ke li speciale mencias lin, ĉar li konis lin tre bone; oni eĉ asertas, ke ili estis parencoj. Cetere, Cide Hamete Benengeli kronikis plej precize kaj skrupule, kaj tion pruvas ĉi historio pri don Quijote, kie li forgesis nenian detalon eĉ minimuman kaj sensignifan. Li servu do kiel ekzemplo al la seriozaj kronikistoj, kies rakontoj aperas tiel skemaj kaj supraĵaj, ke oni apenaŭ povas ilin gustumi, tial, ke la pli esenca kaj substanca parto de la verkoj restis pro preteratento, malico aŭ nescio en la fundo de la inkujo. Laŭdatu do la aŭtoro de *Tablante de Ricamonte* kaj la verkinto de *Grafo Tomillas*, ĉar ili ĉion priskribis ĝis la lasta detalo.

Mi diras do, ke post ol la mulisto vizitis siajn bestojn kaj donis al ili la duan porcion da furaĝo, li kuŝiĝis sur siaj seloj kaj atendis la akurategan Maritornes. Sancho, plena de plastroj kaj jam en la lito, volis endormiĝi sed vane, ĉar la doloro de liaj ripoj estis preskaŭ netolerebla; kaj don Quijote, pro la doloro de la siaj, tenis la okulojn apertaj, kiel la

leporoj. En silento kuŝis la tuta domo, kie lumis nur unu lampo pendants meze de la vestiblo.

Ĉi mirinda kvieto kaj la konstanta absorbiĝo de la pensoj de don Quijote en la aventuroj de la libroj kaŭzintaj lian frenezon, metis al li en la kapon unu el la plej absurdaj ideoj imageblaj, nome, li imagis, ke li venis al fama kastelo (kiel dirite, li prenis por kastelo ĉiun gastejon, kie li loĝis), ke la filino de la gastejestro estas filino de la sinjoro de la kastelo, ke ŝi, ravita de lia ĝentilo, enamiĝas al li kaj promesas, sen la scio de ŝiaj gepatroj, veni kuŝi kun li grandan parton de la nokto. Tia ĥimero ŝajnis al li vero tiel reala kaj valida, ke li komencis angori kaj pensi, ke grava danĝero minacas lian fidelecon. Sed li certigis al si en la koron, ke li nenial faros perfidon al sia sinjorino Dulcinea de El Toboso, eĉ se la reĝino Ginevra mem, kun sia damo Quintaŝona, venus doni sin al li.

Li pensadis pri tielaj absurdoj, kiam alvenis la horo kaj la momento (senfortuna por li) de la vizito de Maritornes. En ĉemizo kaj senŝua, kun la haroj kuntenitaj per fustena kufo, paŝante silente kaj singarde, kun la intenco serĉi la muliston, ŝi eniris en la mansardon, kie la tri viroj kuŝis. Sed apenaŭ ŝi atingis la pordon, don Quijote divenis ŝian ĉeeston, rektiĝis en sidan pozicion, malgraŭ la plastoj kaj la doloro de la ripoj, kaj etendis la brakojn por ricevi en ilin la junan pucelon. Maritornes, kiu mute kaj ŝtelire paŝetis kun la manoj antaŭe, serĉante sian amanton, stumblis en la brakojn de don Quijote. Li forte kaptis ŝin je la pojno, tiris ŝin al si kaj igis ŝin sidiĝi sur la lito, sen ke ŝi kuraĝus diri eĉ unu vorton. Poste li palpis al ŝi la ĉemizon, kiu, kvankam drelika, ŝajnis al li el sateno plej delikata kaj fajna. Ĉirkaŭ la pojno ŝi portis braceleton el vitraj bidoj, sed li vidis ilin sparki kiel raraj perloj orientaj. Ŝiajn krine asprajn harojn li prenis por tiel lumaj fadenoj el brilega oro arabia, ke ili povus eklipsi eĉ la sunon mem. Kaj ŝia buŝo, certe fetora je salato ranca kaj

acidiĝinta, elspiris, ŝajnis al li, odoron mildan kaj aroman. Resume, li prezentis ŝin al si tia, kia oni pentris en liaj libroj certan princinon, kiu am-sopire, kaj kun la garnoj kaj belaĵoj tie menciitaj, ŝtele vizitis grave vunditan kavaliron. Kaj tiel blindis la povra don Quijote, ke nek la kontakto, nek la elspiro, nek aliaj karakterizaĵoj de la bona pucelo, kapablaj igi vomu ĉiun viron krom la mulisto, rivelis al li lian trompiĝon. Kontraŭe: li kredis teni inter la brakoj la diinon de la beleco kaj, premante ŝin al si, diris kun voĉo flustra kaj amema:

—Kiel ege mi dezirus, bela kaj moŝta sinjorino, reciproki la unikan favoron, kiun vi faras al mi montrante la ravenon de via beleco. Sed volas la Fortuno (kiu neniam lacas persekuti la bonulojn) teni min tiel disrompita kaj laca en ĉi lito, ke mi ne povus kontentigi vian deziron, eĉ se mi volus. Krome alia obstaklo, eĉ pli granda, tion baras: la fideleco ŝuldata al la senkompara Dulcinea de El Toboso, sola mastrino de miaj plej sekretaj pensoj. Se ne ekzistus tiaj kontraŭaĵoj, mi ne estus tiel stulta kavaliro ignori la feliĉan ŝancon, kiun via granda bonvolo al mi prezentas.

Maritornes ŝvitis kaj angoris, vidante ŝin kaptita de don Quijote, kaj, sen kompreni aŭ atenti liajn vortojn, silente provis liberigi sin de li. La brava mulisto, kies mavaj deziroj tenis lin vekita, konsciis la ĉeeston de sia amorantino, jam de kiam ŝi eniris en la mansardon, atente aŭskultis la dirojn de don Quijote kaj suspektante, ke Maritornes rompis sian promeson favore al alia persono, ŝtele proksimiĝis iom pli al la lito de la kavaliro, kaj tie restis senmova, por vidi, kio rezultos el tiel nekomprenablaj vortoj. Sed, kiam li rimarkis, ke la servistino baraktas por liberigi sin, kaj ke don Quijote klopodas ŝin reteni, la mulisto ne trovis agrabla tian ludon, levis la brakon kaj donis tiel teruran pugnobaton sur la mincan makzelon de la amanta kavaliro, ke ties buŝo pleniĝis per sango; sed la mulisto, ankoraŭ ne kontenta je

tio, saltis sur lin kaj trote kaj trete surpromenis ties ripojn de la unua ĝis la lasta. La ne tre solida lito, apogita sur apenaŭ firmaj bazoj, ne povis elteni la aldonan pezon de la mulisto kaj cedis kun granda bruo. La gastejestro vekiĝis ĉe tio, laŭte vokis la servistinon kaj, ĉar ŝi ne respondis, li pensis, ke Maritornes certe metis sin en ian implikon. Kun tia suspekto li ellitiĝis, ekbruligis lampon kaj iris al la loko de la bruo. La servistino vidis la mastron veni kaj, ĉar li havis tre kolereman temperamenton, ŝi rifuĝis tremante de timo en la liton de la ankoraŭ dormanta Sancho, kaj tie kuntiris sin, buliĝante.

La gastejestro eniris kaj diris:

—Kie vi troviĝas, putino? Certe ĉio ĉi estas faro via...

Sancho vekiĝis tiam, sentis preskaŭ tute sur li la pezan korpon de la servistino, pensis, ke li suferas inkubon, komencis blinde doni pugnobatojn ien kaj tien, kaj Maritornes, ricevinte mi ne scias kiom da ili, sendis al la diablo sian pudoron kaj reciprokis per tiom da batoj, ke Sancho tute vekiĝis. La ŝildisto, vidante sin tiamaniere traktata de kiu li ne sciis, stariĝis, kiel li povis, kroĉiĝis al Maritornes kaj komencis kun ŝi la plej furiozan kaj amuzan batiĝon de la mondo. Kiam, ĉe la lumo de la gastejstra lampo, vidis la mulisto, kiel statas lia damo, li lasis la hidalgon kaj iris doni al ŝi la necesan helpon. La gastejestro same intervenis, sed kun la intenco puni la servistinon, ĉar li sendube kredis, ke nur ŝi estas la kaŭzo de tia konkordo. Kaj, kiel en la rakonto, kie kato ĉasas raton, rato ŝnuron, kaj ŝnuro vergon, tiel same la mulisto batis Sanchon, Sancho la servistinon, kaj la servistino lin kaj la gastejstron; kaj ĉiu atakis tiel la ceterajn, ke eĉ ne unu momenton ili haltis por spiri. Sed la plibono venis, kiam estingiĝis la lampo de la gastejestro, kaj en la tenebro ili batis sin reciproke iele-

trapele kaj tiel senkompate, ke, kien la pugnoj batis, tie restis nenio sana.

Okazis, ke tiun nokton gastis tie taĉmentano de la Santa Hermandad de Toledo, kaj, kiam li aŭdis la bruegon de la batiĝo, li prenis sian ordon-bastonon kaj la lad-skatolon kun la atestoj pri lia aŭtoritato, eniris nevidante en la mansardon kaj kriis:

—Haltu, je la nomo de la justico! Haltu, je la nomo de la Santa Hermandad!

Harzarde li koliziis kontraŭ la muelita don Quijote, kiu tute senkonscia kuŝis sur la dorso en la falinta lito, palpe prenis lin je la barbo, kaj ripete ordonis: «Obeu la justicon!». Sed kiam li konstatis ke la kuŝanto eĉ ne ete moviĝas, la taĉmentano kredis lin morta, kaj pensis, ke la aliaj en la mansardo murdis lin. Do, kun pli laŭta voĉo, li diris:

—Oni fermu la pordon de la domo! Neniu eliru! Oni mortigis unu viron ĉi tie!

La voĉo alarmis la batalantoj kaj, aŭdante ĝin, ĉiu senmoviĝis, kvazaŭ subite paralizita. Tuj poste la gastejestro sin retiris al sia ĉambro, la mulisto al siaj seloj kaj Maritornes al sia truo. Nur la kompatindaj don Quijote kaj Sancho ne kapablis movi sin. La taĉmentano de la Santa Hermandad lasis la barbon de don Quijote kaj eliris kun la intenco havigi al si lampon kaj serĉi kaj aresti la krimulojn; sed li ĝin ne trovis, ĉar la gastejestro intence estingis la lampon, kiam li sin retiris al sia ĉambro, do la taĉmentano devis iri al la kameno, kie post longa tempo kaj multaj provoj, li ekbruligis alian lampon.

Ĉapitro 17

Kie oni rakontas pri tio, kiel multe mizeris ankoraŭ la brava don Quijote kun sia bona ŝildisto Sancho Panza en la gastejo, kiun je sia propra damaĝo li prenis por kastelo

Fine don Quijote rekonsciiĝis de sia sveno kaj komencis voki sian ŝildiston per la sama tono, kiun li kuŝante uzis la antaŭan tagon en la valetoj de la bastonoj:

—Amiko Sancho, ĉu vi dormas? Ĉu vi dormas, amiko Sancho?

—Ve al mi! Kiel dormi? —respondis Sancho plena de ĉagreno kaj aflikto—. Kiel dormi, post ol ĉiuj diabloj sin pelis al mi ĉi-nokte?

—Sendube vi pravas —diris don Quijote—, ĉar, aŭ mi nenion komprenas, aŭ ĉi kastelo estas ensorĉita. Aŭskultu, Sancho, sciu ke... Sed ne... antaŭe vi devas ĵuri, ke kion mi rakontos al vi, vi tenos sekreta ĝis la tago de mia morto.

—Mi ĵuras —respondis Sancho.

—Mi tion volas de vi, ĉar al mi ne plaĉas, ke oni makulu ies reputacion.

—Jes, mi ĵuras —ripetis Sancho—. Nenion mi diros ĝis via lasta vivotago. Kaj Dio volu, ke jam morgaŭ mi povu paroli.

—Tiel aĉe mi kondutas al vi, Sancho, ke vi volas vidi min senviva tiel baldaŭ?

—Ne temas pri tio —respondis la ŝildisto—. Okazas nur, ke al mi ne plaĉas longe reteni sekreton, ĉar ĝi povus putri en mi pro troa konservado.

—Malgraŭ ĉio, mi fidas je via amo kaj respekto al mi. Sciu do, ke ĉi-nokte mi travivis unu el la plej bonaj kaj raraj aventuroj. Resume mi diru, ke antaŭ nelonge venis al mi la filino de la sinjoro de ĉi kastelo, la plej bela kaj gracia pucelo trovebla en la pli granda parto de la tero. Kion mi povus diri pri la ravo de ŝia persono? Kion pri ŝia vigla inteligento? Kion pri ŝiaj kaŝitaj perfektaĵoj, kies ĉarmon mi preferas prisilenti, pro la fideleco, kiun mi ŝuldas al mia sinjorino Dulcinea de El Toboso? Mi aldonu nur, aŭ ke la ĉielo enviis min pro la trezoro, kiun la sorto metis al mi en la manojn, aŭ ke (kio ŝajnas pli probabla) ĉi kastelo estas ensorcĉita, ĉar ĝuste en la momento, kiam mi tenis kun ŝi dolĉegan konversacion aman, venis, mi ne scias kiel kaj de kie, unu mano fiksita al brako de monstra giganto kaj donis al mi tian baton sur la buŝon, ke mi havas ĝin trempita en sango. Poste la giganto pistis min tiamaniere ke mi fartas pli aĉe ol hieraŭ, kiam la mulistoj ofendis min pro la ekscesoj de Rocinante, kiel vi scias. Mi do konkludas, ke ia ensorcĉita maŭro gardas la trezoran belon de la pucelo, kaj ke ŝi certe ne estas por mi.

—Ankaŭ ne por mi —respondis Sancho—, ĉar pli ol kvarcent maŭroj tiel muelis min, ke la batoj de la janguanoj estis, en komparo, nuraj kisoj kaj karesoj. Sed diru, sinjoro, kial vi nomas rara kaj bona ĉi aventuron, malgraŭ ke ni eliris el ĝi en tiel mizera stato? Kvankam, verdire, ne estis al vi tiel mave, ĉar vi havis en viaj manoj, laŭ viaj diroj, belulinon senkomparan. Sed mi, kion mi havis, krom la plej forta batado, kian, mi pensas, neniam mi denove ricevos en mia vivo? Ve al mi! Ve al tio, ke mia patrino min naskis! Kvankam mi nek estas, nek estos vaganta kavaliro, tamen ĉiam falas sur min la pliparto de la misfortunoj.

—Ankaŭ vi do ricevis vergojn? —demandis don Quijote.

—Ĉu mi ne diris al vi, ke jes, je la diablo?

—Ne plu ĉagreniĝu, amiko. Mi faros nun la raran balzamon, kaj dank' al ĝi ni resaniĝos en palpebruma daŭro.

Ĉe tio, la taĉmentano fine ekbruligis la lampon kaj iris observi la homon, kiun li kredis senviva. Sancho, vidante lin enpaŝi en ĉemizoj, kun dormoĉapo, kun la lampo en la mano kaj kun tre acida mieno, diris al sia mastro:

—Sinjoro, ĉu tio povas esti la ensorĉita maŭro, kiu venas bati nin denove, ĉar eble li pensas, ke ni ne ricevis la kompletan porcion?

—Neeble —respondis don Quijote—, ĉar la sorĉistoj neniam lasas ke oni ilin vidu.

—Eble ili estas nevideblaj sed tre senteblaj. Kaj tion konfirmus miaj ripoj.

—Ankaŭ la miaj —diris don Quijote—. Tamen, tio ne sufiĉe pruvas, ke tia figuro estas la sorĉisto maŭra.

La taĉmentano pli proksimiĝis kaj, vidante ilin en tiel paca interparolo, haltis de surprizo. Cetere don Quijote, nekapabla moviĝi kaŭze de la batoj kaj de la plastroj, kuŝis ankoraŭ sur la dorso. La taĉmentano turnis sin al li kaj demandis:

—Nu, bonulo, kiel vi statas?

—Mi, en via loko, kondukus pli ĝentile —respondis don Quijote—. Ĉu oni kutimas en ĉi lando alparoli tiel al nekonato, idioto?

La taĉmentano, kolera vidi sin krude traktata de viro kun tiel mizera aspekto, ne povis plu elteni kaj, levinte la lampon kun ties tuta oleo, donis per ĝi tian bategon sur la kapon de don Quijote, ke li faris belan kontuzon al la kavaliro. Ĉio obskuriĝis kaj la taĉmentano, sub kovro de la tenebro, rapide eliris el la mansardo.

—Li estas la ensorĉita maŭro, certe, sinjoro —diris Sancho Panza—. Li sendube gardas la trezoron por aliaj, kaj por ni nur pugnobatojn kaj lampofrapojn.

—Efektive —respondis don Quijote—. Sed ne valoras zorgi pri tiaj aferoj de ensorĉo, nek kolero pro ili. Ili estas fantastaj kaj nevideblaj, do ni ne trovus kiel venĝi nin, eĉ se ni plej klopodus. Stariĝu, Sancho, se vi povas, kaj petu de la alkado de ĉi fortreso, ke oni havigu al mi iom da oleo, da vino, da salo kaj da rosmareno. Per ili mi preparos la sanigan balzamon. Mi kredas, ke mi vere ĝin bezonas nun, ĉar mi perdas multan sangon el la vundo, kiun la fantomo faris al mi.

Sancho stariĝis kun kreskanta doloro de siaj ostoj kaj en la obskuro ekiris por serĉi la gastejestron. Sed li stumblis kontraŭ la taĉmentano, kiu subaŭskultis tie por scii, kiel iras la aferoj de lia malamiko, kaj Sancho diris al li:

—Kiu ajn vi estas, sinjoro, bonvolu afable doni al mi iom da rosmareno, da oleo, da salo kaj da vino, ĉar tio necesas por resaniĝo de unu el la plej bonaj vagantaj kavaliroj de la mondo. Li kuŝaĉas tie, pro tio, ke lin grave vundis la manoj de ensorĉita maŭro, kiu troviĝas en ĉi gastejo.

La taĉmentano, aŭdante lin, imagis lin freneza. Sed, ĉar jam vidiĝis la unuaj lumoj de la aŭroro, la taĉmentano apertis la pordon de la gastejo, vokis la gastejestron kaj sciigis lin, kion Sancho deziras. La gastejestro provizis per ĉio la

ŝildiston, kaj tiu ĝin portis al don Quijote, kiu, kun la kapo inter la manoj, ĝemis pro la doloriga lampofrapo, kvankam ĉi lasta faris al li nur du iom elstarajn tuberojn: kion li opiniis sango, tio estis nur la ŝvito fluinta de li en la angoro de la lasta tempesto.

Resume: Don Quijote prenis la ingrediencojn, miksis ilin kaj kuiris la tuton ioman tempon, ĝis li opiniis ĝin preta. Poste li petis flakonon por verŝi la mikson en ĝin, kaj, ĉar en la gastejo ne ekzistis io tia, li decidis uzi ladan oleujon, kiun la gastejestro proponis kaj grandanime donacis al li. Post tio li diris super la oleujo pli ol okdek «patro-niajn», kaj la saman nombron de *salves*, *credos* kaj *avemarías*^[84] kaj ĉe ĉiu vorto li faris benomaniere la signon de la kruco. La ceremonion spektis nur Sancho, la gastejestro kaj la taĉmentano, ĉar la mulisto forestis kaj trankvile okupiĝis pri siaj brutoj.

Fininte la preĝadon, don Quijote volis sperti en si la efikon de la balzamo, kiun li opiniis mirakla, do li trinkis pli ol unu pindon el la kvanto, kiu ne trovis lokon en la oleujo kaj restis do en la poto, kie la pocio antaŭe kuiriĝis. Apenaŭ li finis trinki ĝin, li komencis vomi tiel, ke nenio restis al li en la stomako; la konvulsioj kaj spasmoj de la vomado igis lin ŝviti tiel abundege, ke li petis ke oni kovru lin per la litaĵoj, kaj ke oni lasu lin sola. Tion oni faris kaj, dorminte pli ol tri horojn, li vekigis kaj sin sentis tiel freŝa kaj tiel refortiĝinta, ke li opiniis sin sana, ke li sukcesis fari la veran balzamon de Fierabrás, kaj, ke kun tia rimedo li povus sen timo fronti plej danĝerajn kverelojn, batalojn kaj duelojn. Ankaŭ Sancho Panza opiniis mirakla la reboniĝon de lia mastro kaj petis lin, ke li lasu lin trinki tion, kio restis ankoraŭ en la poto. Don Quijote konsentis, la ŝildisto prenis la poton per la du manoj kaj kun forta fido kaj plej bona volo glutis ĉion senspire, sendante en la ventron preskaŭ tiel multe, kiel antaŭe lia mastro. Nu, okazis, ke la stomako de la ŝildisto ne estis tiel delikata kiel la stomako de don Quijote, ĉar, antaŭ ol li povis

vomi, li suferis tiom da naŭzoj kaj intesto-tordoj, kolapsoj kaj ŝvitoj, ke li pensis, ke vere alvenas lia lasta horo. Kaj vidante sin en tia mizera kaj prostracia stato, li sakris la balzamon kaj la kanajlojn, kiuj donis ĝin al li. Don Quijote diris tiam:

—Mi kredas, Sancho, ke vi aĉe fartas, ĉar vi ne estis armita kavaliro. Certe la balzamo ne utilas al la ne kavaliriĝintaj.

—La diablo prenu min kaj mian tutan familion —respondis Sancho—. Se vi tion sciis, kial vi lasis min trinki?

Ĉe tio la pocio ekefikis, kaj tiel impeta torento komencis ŝpruĉi el la du kanaloj de la kompatinda ŝildisto, ke nek la vimena mato, kie li denove kuŝiĝis, nek la drelika plejdo lin kovranta estis de tiam uzeblaj. Li ŝvitis kaj reŝvitis inter sinkopoj kaj paroksismoj, kaj ne nur li, sed la ceteraj personoj, pensis ke lia vivo finiĝas. Li suferis preskaŭ du horojn da tempesto kaj angoro kaj ĉe la fino li vidiĝis, ne kiel lia mastro, sed tiel konsumita kaj senforta, ke li ne povis stari. Sed don Quijote, kiel dirite, sentis sin freŝa kaj sana, deziris plej baldaŭ foriri por serĉi aventurojn, ĉar, ŝajnis al li, ke li perdas la tempon, se li ne sin dediĉas helpi per sia protekto kaj favoro la mizerulojn de la mondo, des pli ke lia balzamo fortikigis lian senton de sekureco kaj lian memfidon. Pelate do de tia deziro li mem selis la ĉevalon kaj ankaŭ la azenon de Sancho kaj helpis la ŝildiston sin vesti kaj sin surazenigi. Poste li surseliĝis kaj prenis el angulo de la gastejo kurtan pikstangon, ke ĝi taŭgu al li kiel lanco.

Ĉiuj gastejanoj, en la nombro de pli ol dudek, lin rigardis, inter ili la filino de la gastejestro. De sia flanko, don Quijote ne deturnis de ŝi la okulojn kaj de tempo al tempo ĵetis tielan suspiregon, ke ĝi ŝajnis elŝiriĝi el la profundo de lia brusto. Ĉiuj pensis, ke li suspiras, ĉar liaj ripoj lin doloras; tion pensis almenaŭ la personoj vidintaj lin plastrita la antaŭan nokton.

Kiam jam la du sidis sur la seloj, don Quijote vokis de la pordo la gastejstron kaj diris per voĉo kvieta kaj solena:

—Multaj kaj tre grandaj estas la favoroj, kiujn mi ricevis en ĉi kastelo, sinjoro alkado, kaj mi min devontigas danki ilin ĉiun tagon de mia vivo. Se mi povus kvitigi kun vi, venĝante vin kontraŭ ajna orgojla homo, se tia vin ofendis, sciu, ke laŭprofesie mi protektas la senhelpajn, riparas arbitrojn kaj punas perfidojn. Serĉu en via memoro, kaj, se vi trovas ion tiuspecan por konfidi al mi, vi nur diru ĝin, kaj mi promesas, je mia kavalira ordeno, ke oni kontentigos vin kaj repagos al vi laŭ via volo.

La gastejestro respondis kun la sama soleno:

—Sinjoro kavaliro, mi ne bezonas ke via moŝto venĝu min kontraŭ ia ofendo, ĉar mi mem scias, kiel venĝi min, kiam tio necesas. Mi deziras nur, ke via moŝto pagu kiom vi ŝuldas pro la ĉi-noktaj manĝoj kaj litoj de vi ambaŭ en la gastejo, kaj ankaŭ pro la pajlo kaj hordeo de la du brutoj.

—Ĉu ĉi tio estas do gastejo? —demandis don Quijote.

—Jes, kaj tre respektinda.

—Tiam, mi trompiĝis ĝis nun —respondis don Quijote— pro tio, ke mi imagis ĝin kastelo kaj ne mava. Sed, ĉar ĝi estas gastejo, bonvolu pardoni, ke mi neniom pagos al vi: mi ne povas oponi al la ordeno de la vagantaj kavaliroj, kies kodo postulas (kaj neniam mi legis la malon) ke ili ne pagu pensionon aŭ ion ajn en la gastejoj; pro rajto kaj privilegio la kavaliroj meritas, ke oni akceptu ilin senpage, kompanse pro la neelteneble rigora vivado, kiun ili vivas serĉante aventurojn tage kaj nokte, vintre kaj somere, piede kaj rajde, kun varmo kaj kun frido, kun malsato kaj kun soifo, suferante ĉiun krudon de la vetero kaj ĉiun rigoron de la mondo.

—Tio min ne tuŝas —respondis la gastejestro—. Pagu kiom vi ŝuldas, kaj ŝparu al ni viajn kavaliraĵon kaj rakontojn. Al mi interesas nur, ke oni pagu al mi la kontojn.

—Vi estas gastejestro stulta kaj fripona —respondis don Quijote.

Kaj spronante la ĉevalon kaj premante al si la pikstangon, li forlasis la gastejon, sen ke oni lin detenus. Sen retrorigardi, ĉu lia ŝildisto lin sekvas, li rajdis iom da vojo.

Kiam la gastejestro vidis lin foriri sen pagi, li sin turnis kun la sama postulo al Sancho, sed ĉi lasta diris, ke, ĉar lia mastro ne volis pagi, li faros la samon, se konsideri, ke la sama leĝo kaj motivo por ne pagi en gastejoj kaj tavernoj tiel validas ĉe la vagantaj kavaliroj, kiel ĉe ties ŝildistoj. La gastejestro koleris je tio kaj minace diris, ke se li ne ricevos de Sancho la monon, li pentigos lin. La ŝildisto respondis, ke pro la ordeno kavalira de lia mastro, li pagos eĉ ne unu solan groŝon, eĉ se tio kostos al li la vivon; ke li ne volas damaĝi la bonan kaj tradician kutimon de la vagantaj kavaliroj, kaj ke li ne deziras, ke la ŝildistoj de venontaj tempoj kritiku kaj riproĉu lin pro la rompo de tiel meritita privilegio.

Kvazaŭ la aĉa sorto de la kompatinda Sancho volus evidentiĝi ankoraŭfoje, okazis, ke en la gastejo troviĝis kvar lan-kardistoj de Segovia, tri kudril-vendistoj de Córdoba kaj du uloj de la pul-bazaro de Sevilla: friponoj petolaj, gajaj kaj malicemaj, kiuj, kvazaŭ sub la instigo kaj la inspiro de unu sama penso, proksimiĝis al Sancho kaj elprenis lin de sur la azeno. Unu el la grupo iris serĉi plejdon en sian ĉambron, revenis kun ĝi, kaj la uloj ĵetis la ŝildiston sur la plejdon. Poste ili levis la rigardon, vidis, ke la plafono kuŝas ne sufiĉe alte por la efektiviĝo de ilia penso, kaj tiam ili decidis iri en la kralon, kiu havis la ĉielon kiel limon. Tie, metinte Sanchon

en la mezon de la plejdo, ili komencis ĵeti lin al la alto, kaj tiel amuziĝis per li, kiel per hundo en la karnavalo.^[85]

Tiel laŭtis la krioj de la kompatinda bernato,^[86] ke ili atingis la orelon de lia mastro, kiu, haltinte por atente aŭskulti, kredis, ke ia nova aventuro venas renkonte al li. Sed kiam li rekonis la voĉon de sia ŝildisto, li rajdis al la gastejo per la ne tre facila galopo de Rocinante. Li trovis la pordon fermita, kaj komencis ĉirkaŭiri la gastejon, serĉante lokon, tra kie eniri; sed, antaŭ ol li atingis la ne tre altan muron de la kralo, li vidis, kiel kruele oni ŝercas kun lia ŝildisto. Li vidis Sanchon flugi supren kaj suben en la aero kun tiela gracio kaj facilo, ke mi estas certa, ke don Quijote ridus, se li povus reteni sian koleron. Li provis grimpi de la ĉevalo ĝis la supro de la muro, sed li estis ankoraŭ tiel laca kaj muelita, ke li ne povis eĉ moviĝi de sur la selo. Tiel do, de la ĉevalo li komencis adresi tiom da insultoj kaj defioj al la bernantoj de Sancho, ke ne eblas registri ilin ĉi tie. Malgraŭ tio, nek la uloj ĉesis ridi kaj berni, nek la fluganta Sancho haltigis siajn plendojn, miksitajn jen kun minacoj, jen kun humilaj petoj, kaj la uloj ne lasis lin, ĝis ili tute laciĝis. Poste ili kondukis lian azenon al li, helpis lin surseligi sin, metis al li sur la ŝultrojn lian surtuton, kaj la kompatema Maritornes, vidante lin tiel konsumita, pensis, ke iom da akvo farus al li bonon, do ŝi portis al li kruĉon da akvo, rekte el la puto ĉar ĝi estis pli frida. Sancho prenis la ujon kaj, levinte ĝin al la buŝo, subite senmoviĝis, ĉar li aŭdis sian mastron diri per laŭta voĉo:

—Sancho, frato, ne trinku. Tio igus vin morta.^[87] Vidu, mi havas ĉi tie la sanktegan balzamon —kaj li montris al la ŝildisto la ladan oleujon kun la pocio—. Prenu nur du gutojn da ĝi kaj certe vi resaniĝos.

Ĉe la voĉoj de don Quijote, la ŝildisto flankrigardis lin kaj diris per voĉoj eĉ pli laŭtaj:

—Ĉu via moŝto forgesis, ke mi ne estas kavaliro, aŭ eble vi deziras, ke mi finu vomi la intestojn, kiuj ankoraŭ restas al mi de la pasinta nokto? Je la diablo, gardu vian likvoron por vi kaj lasu min trankvila.

Sancho ĉesis paroli kaj komencis trinki preskaŭ en la sama momento. Sed konstatinte, per la unua gluto, ke la kruĉo entenas akvon, li ne volis plu trinki kaj petis de Maritornes, ke ŝi portu al li vinon. Tion ŝi faris tre volonte kaj ĝin pagis per sia mono, ĉar oni diras pri ŝi, ke, malgraŭ sia amora vivo, ŝi posedis kelkon kaj iomon da kristana koro.

Tuj kiam Sancho finis trinki, li enpremis la kalkanojn en la flankojn de la azeno, oni plene apertis al li la gastejan pordon, kaj Sancho elrajdis tre kontenta, ĉar li pagis neniom kaj ĉar li plenumis en tio sian volon, kvankam je la kosto de lia kutima kaŭcio: liaj ripoj.

Verdire, la gastejestro alproprigis al si lian dusakon kiel pagon de la ŝuldata konto, kaj Sancho elrajdis tiel ekscitita, ke li ne rimarkis, ke ĝi ne vojaĝas kun li. La gastejestro volis solide bloki la pordon tuj kiam li vidis la ŝildiston foriri, sed la bernintoj oponis, ĉar ili havis tian naturon, ke, eĉ se efektive don Quijote estus unu el la vagantaj kavaliroj de la Tablo Ronda, ili zorgus ankoraŭ pri li, kiel pri neĝo pasintjara.

[84] Hispanaj vortoj por diversaj preĝoj de la katolika kulto, respektive: «salveo», «kredo-preĝo» kaj «Maria-preĝo»

[85] En la epoko de Cervantes oni kutimis berni (vidu la postan piednoton) hundojn en la karnavalaj festoj.

[86] De «berni», neologismo por malmilde levi kaj relevi en la aeron iun aŭ ion lokitan sur mantelo aŭ plejdo, kies randojn simultane tiras kelke da personoj. Hispane «mantear»; france «berner»; angle «to blanket».

[87] Oni opiniis en Hispanio, kaj kelkaj opinias ankoraŭ, ke trinki fridan akvon estas tre danĝere por la sano. Tial faris la averton don Quijote. Tamen, ŝajnas, ke Maritornes ne havis la saman opinion.

Ĉapitro 18

Kiu temas pri konversacio inter Sancho Panza kaj lia sinjoro don Quijote, kaj aliaj rakontindaj aventuroj

Sancho troviĝis tiel svenema kaj deprimita, ke li eĉ ne povis plu antaŭenirigi la azenon kiam li atingis sian mastron. Vidante lin en tia stato, don Quijote diris:

—Mi vere kredas nun, amiko Sancho, ke tiu kastelo aŭ gastejo estas ensorcita, ĉar, kio, se ne fantomoj kaj transmonduloj, povus tiel kruele amuziĝi je via kosto? Kaj tio konfirmas la fakto, ke, kiam de la muro de la kralo mi ĉeestis la aktojn de via trista tragedio, mi ne povis transgrimpi la muron, kaj eĉ ne povis desalti de Rocinante, sendube ĉar oni ensorcis min. Kaj mi ĵuras je mia fido de kristano, ke, se mi estus provinta grimpi aŭ desalti, mi tiel venĝus vin, ke tiuj kovardaj friponoj memorus por ĉiam sian ŝercon. Mi tion farus, eĉ ignorante la leĝojn de la kavalirismo, kiuj, kiel ofte mi diris al vi, ne permesas, ke kavaliro ataku senrangulon escepte en okazoj de sindefendo aŭ de vera kaj ekstrema bezono.

—Kavaliro aŭ ne kavaliro, ankaŭ mi mem venĝus min, se mi povus. Sed tiam mi ne povis. Tamen mi opinias, ke la uloj sin amuzintaj per mi, estis ne fantomoj aŭ ensorcitoj, kiel via moŝto diras, sed viroj kun karno kaj ostoj kiel ni, kaj ĉiu havis sian nomon. Mi aŭdis ilin paroli, kiam ili bernis min, kaj unu nomiĝis Pedro Martínez, alia Tenorio Hernández, kaj, kiel mi aŭdis, ili nomis la gastejstron Juan Palomeque el Zurdo. Do ne pro ia ensorcĉo vi ne povis grimpi trans la muron de la kralo, nek desalti de la ĉevalo. Kaj kiom mi komprenas el ĉio ĉi, la aventuroj, kiujn ni serĉas, finfine kondukos nin al tiaj

misfortunoj, ke ni ne povos eĉ distingi, kie ni havas la dekstran piedon. Laŭ mia eta inteligento, estus plej bone kaj konvene reveni al nia vilaĝo nun, en la tempo de la falĉado, anstataŭ iri de loko al loko por fali de sitelo en barelon, kiel oni diras.

—Sancho, kiel ete vi komprenas la aferojn de la kavalirismo!
—respondis don Quijote—. Silentu kaj paciencu: venos la tago, kiam vi vidos per viaj propraj okuloj, kiel honora estas la kavalira profesio. Diru: ĉu eble ekzistas en la mondo plezuro aŭ ĝojo komparebla al tio, venki en batalo aŭ triumfi super rivalo? Certe ne.

—Eble vi pravas, mi ne scias —respondis Sancho—. Mi scias nur, ke, de kiam ni estas vagantaj kavaliroj (aŭ vi estas, ĉar mi ne devas alkalkuli min al tiel honora gento), neniam ni venkis en batalo, escepte en la duelo kontraŭ la vasko, kaj eĉ el tio vi tiriĝis kun nur la duono de orelo kaj la duono de la kasko. De tiam, ĉio estas vergoj post vergoj kaj batoj post batoj, kvankam mi superas vin pro la bernado kaj pro tio, ke la bernantoj estis ensorcĉitaj personoj, do mi ne povas venĝi min kontraŭ ili, nek sperti kiom da plezuro havigas la venko super la rivaloj, kiel via moŝto diras.

—Tio min afliktas, kaj devas aflikti ankaŭ vin, Sancho —diri don Quijote—. Sed de nun mi klopodos akiri al mi glavon tiel mirinde forĝintan, ke nenia ensorcĉo povos efiki kontraŭ ĝia mastro. Kaj eĉ eblas, ke la ŝanco havigos al mi la glavon, kiun portis Amadís, kiam li nomiĝis la Kavaliro de la Arda Glavo. Ĝi estis unu el la plej bonaj glavoj iam portataj de kavaliro en la mondo, ĉar krom la jam menciita kapablo, ĝi tranĉis kiel razilo, kaj nenia armaĵo eĉ plej forta kaj sorĉita povis elteni la hakon de ĝia klingo.

—Mi havas tian sorton —diris Sancho—, ke kiam tio okazos, kaj via moŝto akiros al vi tielan glavon, certe ĝi profitos kaj

utilos nur al la armitaj kavaliroj, kiel la balzamo; dume la ŝildistojn trafos ankoraŭ ĉiu plago.

—Ne timu tion —diris don Quijote—. La ĉielo traktos vin pli afable.

Don Quijote kaj lia ŝildisto tion babilis rajdante, ke tiam nia kavaliro distingis sur la vojo foran, grandan kaj densan nubon da polvo, kiu ruliĝis al ili. Don Quijote sin turnis al la ŝildisto kaj diris:

—Ho, Sancho, en ĉi tago oni vidos, kiel favoras al mi la sorto. En ĉi tago, mi diras, montriĝos plej brile la kuraĝo de mia brako, kaj ni plenumos tiajn farojn, ke ilin oni skribos en la libron de la famo por la venontaj generacioj. Ĉu vi vidas tie la nubon da polvo, Sancho? Nu, ĝi leviĝas de la piedoj de la armeo formita per nekalkulebla nombro da diversaj gentoj, kiuj sin direktas al ni.

—Se tiel, temas pri du armeoj —respondis Sancho—, ĉar sur kontraŭa flanko leviĝas ankaŭ simila nuboj.

Don Quijote tien rigardis, kaj, vidante ke lia ŝildisto pravas, li tre ĝojis. Certe li pensis, ke du armeoj venas renkonti kaj ataki unu la alian mezen de la vasta ebenaĵo, ĉar ĉiuhore kaj ĉiumomente lia imago plenis de la bataloj, ensorĉoj, aventuroj, absurdoj, am-aferoj kaj defioj menciataj en la kavaliraj libroj, kaj ĉio, kion li pensis, parolis aŭ faris, kreiĝis sub la influo de tiaj fantaziaĵoj. Nu, la nubon da polvo levis du grandaj gregoj da ŝafoj kaj ŝafinoj alpelataj el kontraŭaj direktoj, sed pro la polvo ne vidiĝis ankoraŭ. Kaj tiel emfaze asertis don Quijote, ke temas pri armeoj, ke Sancho fine kredis lin, kaj demandis:

—Kion ni faru do, sinjoro?

—Kion? —ripetis don Quijote—. Helpi kaj favori la senhelpajn kaj mizerajn. Sciu, Sancho, ke la armeon ĉi-flankan gvidas kaj komandas la granda imperiestro Alifanfarón, sinjoro de la vasta insulo Trapobana. La alia armeo, malantaŭ ni, apartenas al lia malamiko, la reĝo de la garamantoj, Pentapolín Senmanika, tiel nomata, ĉar ĉiam li rajdas en la batalojn kun la dekstra brako nuda.

—Kial tiuj du sinjoroj tiel forte abomenas unu la alian? —demandis Sancho.

—Ĉar Alifanfarón estas kolerega pagano. Li enamiĝis al la filino de Pentapolín, bela kaj gracia damo kaj krome kristana, kies patro ne volas doni ŝin al la pagana reĝo, se tiu ne forĵuras antaŭe la kredon de sia falsa profeto Mahometo kaj konvertiĝas al la kristanismo.

—Je mia barbo! —diris Sancho—. Mi helpos Pentapolín, kiom mi povos, ĉar li laŭdece kondukas.

—En tio vi plenumos vian devon, Sancho —diris don Quijote—, ĉar, por interveni en ĉi tiaj bataloj, oni ne bezonas esti armita kavaliro.

—Sendube, sed, kie mi lasos la azenon, por trovi ĝin post la batalo? Ĉar mi kredas, ke ĝis nun ne ekzistas la kutimo batali de sur azenoj.

—Vi pravas —diris don Quijote—, kaj mi rekomendas, ke vi lasu ĝin ie ajn, senkonsidere ĉu ĝi perdiĝos aŭ ne: ni disponos tiom da ĉevaloj post nia triumfo, ke eĉ Rocinante estas en danĝero, ke mi ŝanĝos ĝin por alia. Sed atentu: mi volas montri al vi ĉefajn kavalirojn de du armeoj, kaj, por observi ilin pli bone, ni retiru nin al la altaĵo tie staranta, de kie certe la armeoj bone distingeblas.

Tion ili faris, lokante sin sur monteto, de kie oni klare vidus la gregojn (transformitajn de don Quijote en armeojn), se la nubo de polvo levata de la hufoj, ne vualus kaj konfuzus la vidon. Tamen, kontemplante tion, kio ekzistis nur en lia fantazio, li diris per laŭta voĉo:

—Tiu kavaliro kun la insigno flava kaj kun la ŝildo klare surpentrita per kronita leono kuŝanta ĉe la piedoj de pucelo, estas la kuraĝa Laurcalco, sinjoro de la Arĝenta Ponto; la alia kun insigno de orkoloraj floroj kaj kun la ŝildo, kie aperas tri arĝentaj kronoj sur blua fono, estas la timata Micocolemo, granda duko de Quirocia; la alia kun gigantaj brakoj kaj kruroj, rajdanta ĉe lia dekstra flanko, estas la neniam timema Brandabarbarán de Boliche, sinjoro de la tri Arabioj. Li sin kovras per la haŭto de serpento kaj, laŭ la famo, uzas kiel ŝildon unu el la pordoj de la templo, kiun renversis Ŝimŝono por venĝi sin kontraŭ siaj malamikoj. Sed turnu la rigardon ĉi-flanken: ĉe la fronto de la alia armeo jen la ĉiam venkanta kaj neniam venkita Timonel de Carcajona, princo de la nova Vaskujo; lia insigno havas kvar kvadratojn de sama grandeco: bluan, verdan, blankan kaj flavan, kaj lia ŝildo, orkoloran katon sur bruna fono kun la devizo: «Miu», formita per la unuaj literoj de la nomo de lia damo, kiu, laŭ la diroj, estas la senkompara Miulina, filino de la duko de Alfeñiquén del Algarbe. La alia, kies potenco kaj sovaĝa ĉevalo devas subteni lian grandan pezon kaj premon, estas la novica kavaliro franca Pierre Papin, sinjoro de la baronlando de Utrique, kaj portas neĝe blankan insignon kaj senembleman ŝildon. La alia, kiu spronas per feraj kalkanumoj rapidan kaj striitan zebbron kaj portas insignon de bluaj pokaloj, estas la granda duko de Nerbia, Espartafilardo de la Bosko, kaj havas sur la ŝildo, kiel emblemon, asparagon kun la jena devizo: «Mia sorto rampas».

Don Quijote, inspirita de sia mirinda frenezo, nomadis tiamaniere multajn kavalirojn de la du fantaziaj skadroj kaj

senplie atribuis al ĉiu insignon, emblemon kaj devizon; kaj sen halti en siaj priskriboj, li daŭrigis:

—La skadron ĉi-flankan formas gentoj de diversaj landoj: jen la trinkantoj de la dolĉa akvo de la fama Ksanto; la montaranoj de Masilio; la kribrantoj de la fajnega oro de la feliĉa Arabio; la loĝantoj sur la famaj kaj freŝaj bordoj de la klara Termodono; la drenantoj, per multaj kaj diversaj manieroj, de la ora Paktolo; la numidoj kies promesoj ne fidindas; la persoj, famaj pro siaj sagoj kaj arkoj; la partoj; la medoj, kiuj batalas forkurante; la araboj kun porteblaj tendoj; la skitoj, tiel kruelaj, kiel haŭtoblankaj; la etiopoj kun boritaj lipoj, kaj aliaj nenombreblaj gentoj, kies vizaĝojn mi vidas kaj rekonas, kvankam mi ne memoras iliajn nomojn. En la alia skadro venas la trinkantoj de la kristale klara Betis, ĉe kies bordoj multas la olivarboj; la viroj, kies vizaĝo freŝas kaj glatas pro ilia uzo de la akvo de la riĉa kaj orkolora Tajo; la gustumantoj de la saniga akvo de la dia Genil; la loĝantoj en la herboriĉaj kampoj de Tarŝiŝo; la ĝuantoj de la elizeaj teroj de Jerez; la manĉanoj riĉaj kaj kronitaj per blondaj spikoj; la sin vestantoj per fero, posteuloj de la antikvaj gotoj; la sin banantoj en Pisuerga, fama pro la mildo de sia fluo; la paŝtanoj de gregoj su la vastaj herbejoj ĉe la sinua Guadiana, prikantata pro sia subteriĝanta fluo; la tremantoj de frido inter la arbaroj pireneaj kaj inter la blankaj flokoj de la alta Apenino, kaj fine ĉiu gento troviĝanta inter la limoj de Eŭropo.

Je Dio, kiel multe da gentoj li nomis, kaj kiel multe da regnoj li menciis, plene mergita kaj absorbita en ĉio, kion li legis en siaj mensogaj libroj! Kaj kavalirojn kaj landojn li difinis kun mirinda rapido atribuate al ĉiu ties proprajn atributojn. Sancho Panza pendis de liaj vortoj, sen diri ion, kaj de tempo al tempo turnis la kapon por vidi, ĉu li povas distingi la kavalirojn menciatajn de la mastro. Sed vidante neniun, li diris:

—Sinjoro, la diablo ĝin prenu; nek viro, nek giganto, nek kavaliro, nek io vidiĝas ĉi-ĉirkaŭe. Almenaŭ mi vidas nenion. Eble temas pri ensorcitoj, kiel la fantomoj de la pasinta nokto.

—Kial vi diras tion? —respondis don Quijote—. Ĉu vi ne aŭdas la henon de ĉevaloj, la sono de klarionoj kaj la bruon de tamburoj?

—Mi aŭdas nur multajn beojn de ŝafoj kaj ŝafinoj.

Kaj li diris la veron, ĉar la du gregoj estis jam proksimaj.

—Vi havas tiom da timo, Sancho, ke vi mise aŭdas kaj mise vidas. Unu el la sekvoj de la timo estas, ke ĝi perturbas la sensojn kaj deformas la objektojn, kaj, se vi tiel multe timas, prefere retiriĝu kaj lasu min sola. Sufiĉas nur mia persono por triumfigi la partion, kiun mi helpos.

Tion dirinte, li spronis la ĉevalon, horizontaligis la lancon kaj trarajdis fulmorapide la deklivon de la altaĵo, dum Sancho laŭte kriis:

—Revenu, via moŝto, sinjoro don Quijote! Je Dio, vi atakas ŝafojn kaj ŝafinojn. Veinda tago, kiam mia patro min generis! Revenu! Kia frenezo vin trafis? Rigardu, ĉi tie vidiĝas nek gigantoj, nek kavaliroj, nek katoj, nek insignoj, nek ŝildoj kun unu aŭ kun diversaj koloroj, nek pokaloj bluaj aŭ demonaj. Kion vi faras? Ve al mi, pekulo!

Sed tio tute ne impresis nian hidalgon. Kontraŭe, li laŭte diradis:

—Nu, kavaliroj batalantaj sub la flagoj de la kuraĝa imperiestro Pentapolín Senmanika, sekvu min. Vi rimarkos, kiel facile mi venĝos lin kontraŭ lia malamiko Alifanfarón de la Trapobana.

Tion dirante, li enrajdis en la mezon de la skadro de ŝafinoj kaj komencis lanci ilin kun tia kuraĝo kaj furiozo, ke ŝajnis, ke efektive li lancas ĝismortajn malamikojn. La paŝtistoj kaj la mastroj akompanantaj la gregojn, kriis al li, ke li ne faru tion. Sed vidante, ke iliaj krioj vanas, ili deligis la ĵetilojn de sia zono kaj komencis saluti al li la orelojn per ŝtonoj grandaj kiel la pugno. Don Quijote tute ignoris la ŝtonojn, kaj eĉ pli impete galopis ien kaj tien kriante:

—Kie vi estas, orgojla Alifanfarón? Venu al mi, ke mi estas sola kaj deziras, nur inter vi kaj mi, provi vian forton kaj preni de vi la vivon, pro la ĉagrenoj, kiujn vi kaŭzas al la kuraĝa Pentapolín Garamanta.

Ĉe tio alflugis solida peco da roko kaj, frapante lin sur unu flankon, enbatis al li du ripojn en la korpo. Li vidis sin kun tiel forta kontuzo, ke li kredis sin senviva aŭ, almenaŭ, grave vundita, kaj, memorante pri sia likvoro, elprenis la oleujon, metis ĝin al sia buŝo kaj komencis ĵeti la balzamon en la stomakon. Sed antaŭ ol li trinkis kiom li opiniis sufiĉa, alflugis alia kaŝtano kaj tiel plene trafis lian manon kaj la oleujon, ke ĉi lastan ĝi disrompis en pecojn kaj pase frakasis al li tri kvar dentojn kaj molarojn kaj kontuzegis du fingrojn. Tia estis la unua bato, kaj tia la dua, ke la kompatinda kavaliro neeviteble falis de la ĉevalo. La paŝtistoj proksimiĝis al li, pensis, ke ili lin mortigis, do kolektis haste siajn gregojn, prenis sur la ŝultrojn la mortigitajn ŝafinojn, proksimume ok, kaj foriris senplie.

La tutan tempon Sancho rigardis de la monteto la frenezaĵojn de sia mastro, ŝiris al si la barbon kaj malbenis la horon kaj la momenton, en kiuj la sorto renkontigis lin kun don Quijote. Vidante lin kuŝanta sur la grundo kaj la paŝtistojn for, li sobiris de la altaĵo, proksimiĝis al li, trovis lin konscia, kvankam en tre mava stato, kaj diris:

—Ĉu mi ne avertis vin, sinjoro don Quijote, ke vi revenu, ke vi atakos ne armeojn, sed ŝafarojn?

—Eĉ tion povas transformi kaj igi nevidebla la fripona sorĉisto, malamiko mia! Sciu, Sancho, ke tiaj uloj facile vidigas al ni kion ili deziras, kaj ĉi maliculo min persekutanta enviis min pro la gloro, kiun li, sciis, mi povus gajni per ĉi batalo, kaj tial li sanĝis la skadrojn en ŝafinarojn. Se vi volas konvinkiĝi, Sancho, ke mi diras la veron, faru jenon: ekrajdu sur la azeno kaj senplie sekvu ilin. Vi vidos, ke, je ioma distanco de ĉi tie, ili reprenas sian veran formon kaj estas jam ne plu ŝafoj, sed viroj el karno kaj ostoj, kiaj mi pentris al vi. Sed ne foriru ankoraŭ, ĉar mi bezonas vian bonvolon kaj helpon. Venu pli proksimen kaj rigardu kiom da dentoj kaj molaroj mankas, ĉar mi havas la impreson, ke eĉ ne unu sidas jam en la buŝo.

Tiel proksimiĝis Sancho, ke li preskaŭ metis la okulojn en lian buŝon. Ĝuste tiam la balzamo efikis en don Quijote, kaj ĉio, kio sidis en lia stomako, forĵetiĝis kun la forto de kuglo kaj plene trafis kaj ŝmiris la barbon de la kompatema ŝildisto.

—Sankta Maria! —diris Sancho—. Kio okazas? Certe la povra pekulo estas morte vundita. Li vomas sangon tra la buŝo.

Sed atentante iom pli, li konstatis pro la koloro, odoro kaj saporo, ke temas ne pri sango, sed pri la balzamo, kiun, li vidis, don Quijote trinkis el la oleujo. Kaj Sancho sentis tiel grandan naŭzon ke lia stomako turniĝis, li vomis la tripojn sur lian mastron, kaj la du prezentis tiam tre elegantan aspekton.

Sancho reiris al la azeno por serĉi en la dusako, ion, per kio purigi kaj pansi sian mastron kaj, ne trovante la dusakon, preskaŭ perdis la kapon, malbenis sin refoje kaj decidis en si

forlasi sian mastron kaj reveni al sia vilaĝo, kvankam li perdis la salajron por la ĝisnunaj servoj kaj esperon regi iam la promesitan insulon.

Ĉe tio stariĝis don Quijote, metis la livan manon sur la buŝon, por ke la restantaj dentoj ne elfalu, prenis per la alia la bridon de Rocinante (la ĉevalo eĉ ne iomete moviĝis de la flanko de sia mastro, tiel bona kaj lojala ĝi estis) kaj iris al Sancho, kiu staris kun la brusto apogita al la azeno kaj kun la mano sur la vango, laŭ la maniero de profunde enpena homo. Don Quijote, vidante lin en tia teniĝo rivelanta tre fortan aflikton, diris:

—Sciu, Sancho, ke unu homo ne superas alian, se li ne faras pli ol la alia. Ĉi ŝtormoj nin frapantaj indikas, ke la vetero baldaŭ sereniĝos, kaj ke niaj aferoj iros pli bone. Nek bono nek mavo povas eterne daŭri, sekve la bono jam proksimas, ĉar ni suferis longan tempon la mavon. Ne afliktiĝu do pro miaj misfortunoj, ĉar ili vin ne trafas.

—Ĉu vere? —diris Sancho—. Kiun do, se ne la filon de mia patro, oni bernis hieraŭ? Kaj, se ne mia, kies estis la dusako mankanta kun siaj valorajoj?

—Kion! Ĉu mankas via dusako, Sancho?

—Jes, ĝi mankas.

—Tiel do, hodiaŭ ni havos nenion por manĝi.

—Tio okazus, se ne troviĝus sur ĉi kampoj la herboj, kiujn, via moŝto diras, vi konas, kaj kiujn la malfeliĉaj kavaliroj kiel vi, kutimas gustumi anstataŭ alian manĝon.

—Tamen —respondis don Quijote— mi preferus nun bonan pecon da pano kaj du haringojn al ĉiuj herboj, eĉ se priskribitaj de Dioscórides kaj komentitaj de doktoro Laguna.

Nu, amiko Sancho, surzeniĝu kaj sekvu min, ĉar Dio, la universala provizanto, ne ignoros nin, des pli, ke ni laboras je Lia servo. Li forgesas nek la moskitojn de la aero, nek la vermojn de la tero, nek la ranidojn de la akvo, kaj tiel kompatemas, ke Li igas la sunon lumi super la bonaj kaj la malicaj kaj la nubojn pluvi sur la justajn kaj la arbitrajn.

—Pli taŭgas via moŝto kiel predikisto, ol kiel vaganta kavaliro —diris Sancho.

—Pri ĉio sciis, kaj devas scii, la vagantaj kavaliroj, Sancho. En la pasintaj tempoj, pli ol unu kavaliro haltis meze de la vojo kaj faris predikon aŭ paroladon, kvazaŭ li estus diplomito de la universitato de Parizo, kio pruvas, ke la lanco ne stumpigas la plumon, nek la plumo la lancon.

—Sendube, via moŝto pravas —respondis Sancho—, sed ni foriru jam serĉi tranoktejon, kaj Dio volu, ke manku en ĝi plejdoj, bernantoj, fantomoj kaj sorĉitaj maŭroj, ĉar, se ne, ni estos perditaj.

—Petu tion de Dio, frato —diris don Quijote—, kaj konduku min, kien ajn vi volos, ĉar ĉi-foje mi deziras, ke vi mem elektu nian loĝejon. Sed donu al mi la manon kaj palpu per la fingroj, kiom da dentoj kaj molaroj mankas al mi en la dekstra flanko de la supra makzelo, ĉar tie mi sentas la doloron.

Sancho metis la fingrojn en lian buŝon kaj diris palpante:

—Kiom da molaroj ordinare havis mia moŝto en ĉi flanko?

—Kvar, krom la saĝomolaro; ĉiuj kompletaj kaj tre sanaj.

—Ĉu via moŝto estas tute certa? —demandis Sancho.

—Mi diras kvar, se ne kvin. Neniam oni eltiris el mia buŝo eĉ unu denton aŭ molaron, kaj eĉ ne unu elfalis aŭ putris de kario aŭ de reŭmatismo.

—Nu, en ĉi suba parto —diris Sancho— via moŝto havas nur du molarojn kaj duonon, kaj en la supra, nek duonon, nek ion: ĉio glatas kiel la polmo de la mano.

—Ve al mi! —diris don Quijote, aŭdinte la afliktan sciigon de la ŝildisto—. Mi preferus perdi anstataŭe unu brakon, escepte se ĝi estus la brako de la glavo. Sciu, Sancho, ke buŝo sen molaroj egalas al muelejo sen ŝtono, kaj ke pli multe estimindas unu dento ol unu diamanto. Sed ni, kiel membroj de la rigora ordeno kavalira, devas nin elmeti al ĉi tiaj misfortunoj. Surseliĝu do, amiko, kaj iru ĉe la fronto; mi sekvos vin laŭ via paŝo.

Tion faris Sancho kaj, tenante sin proksime al la ĉefa vojo, sin turnis al la direkto, kie li esperis trovi ian loĝejon. Ili rajdis lante, ĉar la makzeloj tiel doloris al don Quijote, ke li, en sia sufero, ne zorgis rapidi pli. Sancho volis distri kaj amuzi lin per iom da konversacio kaj diris, interalie, kiom oni trovos en la sekvanta ĉapitro.

Ĉapitro 19

Pri la prudenta konversacio inter Sancho kaj lia mastro, pri la aventuro kun kadavro kaj pri aliaj famaj eventoj

—Ŝajnas al mi, sinjoro, ke la misfortunoj nin trafantaj de kelkaj tagoj sendube estas ia puno pro la pekoj de via moŝto kontraŭ la ordeno kavalira,^[88] ĉar vi ne plenumis vian ĵuron ne manĝi ĉe kovrita tablo, ne kuŝi kun la reĝino kaj ne fari la aliajn aferojn, ĝis vi gajnus al vi la helmon de Malandrino, aŭ kiel ajn li nomiĝas, mi ne bone memoras la nomon de tiu maŭro.

—Vi pravas, Sancho —diris don Quijote—, kaj verdire mi forgesis pri tio. Sed aliflanke estu certa, ke oni vin bernis, ĉar ankaŭ vi pekis, ne memorigante al mi pri la ĵuro. Tamen mi faros la necesan riparon; en la ordeno kavalira oni povas ĉion aranĝi.

—Kiel mi pekis?, laŭ mia scio, mi ĵuris nenion! —respondis Sancho.

—Ne gravas, ĉu vi ĵuris aŭ ne —diris don Quijote—. Kiom mi komprenas, vi tamen kunkulpas. Sed ni havigos al ni la rimedon.

—Se vi tiel opinias —respondis Sancho—, via moŝto zorgu, ne forgesi trovi ĝin, kiel vi forgesis la ĵuron. Alie la fantomoj eble deziros amuzi sin denove je mia kosto, kaj eĉ je la via, se ili vidos vin tiel obstina.

Kiam la nokto falis, ili rajdis ankoraŭ, babilante pri tiu kaj pri aliaj aferoj sen ke ia tranoktejo vidiĝus. Sed, plej

bedaŭrinde, ilin torturis la malsato, ĉar ankaŭ ilia viktualio perdiĝis kun la dusako. Kaj, kiel kulmino de ilia misfortuno, ilin trafis aventuro, kiu ne bezonis la garnojn de la fantazio por aspekti aŭtentika. Kvankam la nokto iĝis tre obskura, ili ne ĉesis rajdi, ĉar Sancho kredis, ke pro tio, ke ili iras sur ĉefvojo, ili renkontos gastejon en la distanco de ses aŭ ok mejloj. Okazis do, ke la nokto nigris, la ŝildisto malsatis, lia mastro deziris manĝi, kaj tiam ili rimarkis, ke sur la vojo proksimiĝas granda nombro da lumoj, kiel moviĝantaj steloj, Sancho konsterniĝis, ilin vidante, kaj ankaŭ don Quijote sentis ioman agitiĝon. La ŝildisto haltige tiris je la kondukiloj de la azeno, la kavaliro je la bridoj de la ĉevalo, kaj, senmovaj, ili fikse rigardis, kio povas esti tiaj lumoj. La lumoj proksimiĝis iom post iom kaj, ju pli proksimaj, des pli grandaj ili ŝajnis. Ĉe tio Sancho komencis tremi de la piedoj ĝis la kapo, kaj al don Quijote stariĝis la haroj. Sed ĉi lasta iom revigliĝis kaj diris:

—Jen, sendube, grandega kaj danĝerega aventuro, kie mi devos montri mian tutan forton kaj kuraĝon.

—Ve al mi! —respondis Sancho—. Kaj se okaze ĉi tio estas aventuro de fantomoj (kiel mi kredas ĉiufoje pli certe), kie troviĝas la ripoj kapablaj ĝin elteni?

—Eĉ se tie venas la tuta fantomaro de la mondo —diris don Quijote—, mi ne permesos, ke ili tuŝu eĉ unu fadeneton de via vesto. En la alia okazo ili mokis vin, ĉar mi ne sukcesis transsalti la muron de la kralo. Sed nun ni troviĝas sur aperta kampo, kie mi povas laŭvole svingi la glavon.

—Kaj se ili ensorĉos kaj senmovigos vin, kiel ili faris la pasintan fojon, ĉu taŭgos la kampo aperta, aŭ ne aperta?

—Tamen, mi nur petas vin, Sancho, teni vin firma. La sperto diros al vi, ke vi devas fidi je mia kuraĝo.

—Mi tenos min firma, se Dio volos —respondis Sancho.

Deviinte al la flanko de la vojo, ili denove turnis la rigardon, por vidi, kio povas esti la marŝantaj lumoj, kaj iom poste ili rimarkis multe da blankaj figuroj. Ĉe tiel terura vizio la kuraĝo de Sancho tute svenis, kaj liaj dentoj komencis klakadi, kvazaŭ lin posedus kvartana febro. Liaj tremoj kaj klakoj eĉ pli intensiĝis, kiam ili klare vidis ke la figuroj estas proksimume dudek viroj en blankaj roboj, ĉiuj rajdantaj kaj kun brulaj torĉoj en la mano; ilin sekvis portolito kovrita per nigraj tukoj kaj ankaŭ ses aliaj rajdantoj envolvitaj en funebro ĝis la hufoj, ne de ĉevaloj, sed de muloj, kiel klare evidentiĝis pro la lanterno de ilia paŝo. La blankaj figuroj murmuris tradente per voĉo obtuza kaj plenda. Ĉi stranga spektaklo en tia horo kaj en tia soleca loko sufiĉus por teruri, ne nur la koron de Sancho, se ĝi ne estus jam tute terurita, sed eĉ la koron de don Quijote. Tamen okazis alie kun nia hidalgo, ĉar lia vigla fantazio igis lin imagi, ke antaŭ li prezentiĝas unu el la aventuroj de liaj libroj. Li imagis, ke en la portolito kuŝas kavaliro grave vundita aŭ eĉ morta, kaj ke la tasko lin venĝi, estas nur al li rezervita. Tiel do senplie li horizontaligis la lancon, plifirmiĝis sur la selo, kun gracia kaj brava teniĝo alrajdis ĝis la mezo de la vojo, kaj, kiam li vidis la robulojn pli proksimaj, diris per laŭta voĉo:

—Haltu, sinjoroj, kiuj ajn vi estas, kaj informu min pri viaj personoj, de kie vi venas, kien vi iras, kaj kio kuŝas en la portilo, ĉar laŭŝajne, aŭ vi krimis, aŭ oni krimis kontraŭ vi, kaj konvenas, kaj necesas, ke mi tion sciu, ĉu por puni vin pro via fiaĵo, ĉu por venĝi vin kontraŭ la arbitro al vi farita.

—Ni devas rapidi —respondis unu el la viroj en blanko— ĉar la gastejo troviĝas diste, do ni ne povas halti por doni tiom da klarigoj.

Kaj spronante la mulon, li volis preterpasi. Don Quijote koleriĝis pro tia respondo, kaj, prenante la bridon de la mulo, diris:

—Haltu kaj kondu tu pli ĝentile, kaj donu al mi la petitajn informojn. Alie vi ĉiuj pretiĝu batali kontraŭ mi.

La mulo, kiu estis timema, teruriĝis, kiam don Quijote prenis ĝian bridon, kaj tiel ĝi baŭmis, ke ĝia mastro glitis sur ĝian pugon kaj falis al la grundo. Unu servisto surpieda, vidinte la robulon fali, komencis insulti don Quijote, kiu, jam furioza, horizontaligis la lancon, impetis senplie kontraŭ unu el la figuroj en funebro kaj renversis lin sur teron kun unu grava vundo. Poste li sin turnis kontraŭ la ceteraj, kaj vidindis, kiel rapide li atakis kaj dispelis ilin: Rocinante moviĝis kun tia facilto kaj fiero, ke ŝajnis, ke en tiu momento elkreskis el ĝi flugiloj. La robuloj, homoj timemaj kaj sen armiloj, fuĝis tuj de la batalejo kaj komencis kuri tra la kampoj kun la flamaj torĉoj enmane, tiamaniere, ke ili ŝajnis maskitaj figuroj petolantaj en ia gaja festo nokta. La viroj en funebro, envolvitaj kaj reenvolvitaj en siaj longaj roboj kaj sutanoj, ne povis movi sin, kaj don Quijote, sen ia danĝero, tradraŝis ilin kaj igis ilin forlasi la kampon kontraŭvole, ĉar ili pensis, ke li estas ne homo, sed diablo veninta de la infero por forpreni de ili la kadavron kuŝantan en la portolito. Ĉion rigardis Sancho, admirante la ardon de sia mastro, kaj diris en si: «Sendube mia sinjoro estas tiel kuraĝa kaj rezoluta, kiel li asertas».

Apud la unua falinto kuŝis ankaŭ flama torĉo, kaj ĉe ties lumo don Quijote vidis lin, proksimiĝis, metis al li sur la vizaĝo la pinton de la pikstango kaj ordonis, ke li kapitulacu, alie li mortigus lin.

—Mi jam kapitulacis pli ol sufiĉe. Mi havas unu kruron rompita kaj ne povas movi min. Mi petas vian moŝton, se vi

estas kristana kavaliro, ne mortigi min, ĉar vi faros sakrilegion: mi estas licenciulo kaj jam ricevis la minorajn ordinojn.

—Se vi apartenas al la Eklezio, kio, je la diablo, prenis vin ĉi tien?

—Kio, sinjoro? La aĉa sorto mia —respondis la kuŝanto.

—Eĉ pli aĉa sorto vin minacos, se vi ne respondos kion mi antaŭe demandis al vi.

—Volonte mi kontentigos la scivolon de via moŝto — respondis la licenciulo—. Sciu do, sinjoro, ke, kvankam mi diris, ke mi estas licenciulo, vere mi estas nur bakalaŭro, nomiĝas Alonso López kaj naskiĝis en Alcobendas. Mi venas de Baeza kun aliaj dek unu pastroj, la forkurintaj torĉuloj. Ni iras al la urbo Segovia, eskortante la kadavron de kavaliro mortinta en Baeza kaj kuŝanta en la portilo. Nu, kiel dirite, ni portas liajn ostojn al lia tombo, troviĝanta en Segovia, kie li naskiĝis.

—Kaj, kiu mortigis lin? —demandis don Quijote.

—Dio, pere de maligna febro.

—Tiel do, la Sinjoro liberigis min de la tasko venĝi lian morton. Tian venĝon mi entreprenus, se ajna persono estus lin mortiginta, sed, ĉar lin mortigis Dio, oni povas nur silenti kaj leveti la ŝultrojn. Kaj la samon mi farus, se Li mortigus min. Mi volas, ke via pastra moŝto sciu, ke mi estas kavaliro de La Mancha, nomiĝas don Quijote kaj laŭ mia profesio vagas tra la mondo riparante arbitrojn kaj korektante ofendojn.

—Mi ne komprenas, kiel vi riparas —diris la bakalaŭro—, ĉar vi rompis al mi unu kruron, kaj certe ĝi estos neriparebla ĝis

la fino de mia vivo. Kaj la ofendo, kiun vi korektis konsistis en tio: lasi min tiel ofendita, ke mi restos ofendita por ĉiam. Ve!, sufiĉa misfortuno min trafis, kiam mi renkontis vin sur sur la vojo de viaj aventuroj!

—Ne ĉiam turniĝas tiel la aferoj —respondis don Quijote—. La mavo kuŝas en tio, sinjoro bakalaŭro Alonso López, ke vi venis en la nokto, vestitaj per tiaj roboj, kun flamaj torĉoj, kovritaj de funebro kaj preĝante per murmuroj, kaj verdire vi ŝajnis io abomeninda kaj monstra; do mi ne povis ne plenumi mian devon atakante vin ĉiujn. Kaj mi atakus vin ankoraŭ, se efektive vi estus la satanoj mem de la infero, kiel mi firme kredis antaŭe.

—La sorto tion volis —diris la bakalaŭro—. Mi nur petas vian moŝton, sinjoro kavaliro vaganta (bedaŭrinde, ke vi vagis ĉi-nokte!) min helpi eltiri min de sub la mulo, ĉar ĝi preme gas al mi la gambon de la piedingo ĝis la selo.

—Vi ne devas lasi min paroli tiel longe —diris don Quijote—. Kial vi ne sciigis min pli frue pri via stato?

Li laŭte vokis la ŝildiston, sed Sancho ne volis iri, ĉar tiam li sin dediĉis priŝteli unu el la muloj de la bravaj ekleziuloj, ŝarĝita per abunda viktualio. Sancho utiligis sian surtuton kiel sakon, metis en ĝin ĉion, kion ĝi povis enpreni, kaj ŝargis per ĝi sian azenon. Tiam li iris al sia mastro, eltiris kun li el sub la peza mulo la sinjoron bakalaŭron, helpis ĉi lastan surseligi sin, donis al li lian torĉon, kaj siaflanke don Quijote diris al la ekleziulo, ke li sekvu la vojon de siaj kompanoj, al kiuj li prezentu liajn ekskuzojn pro la farita damaĝo kaj klarigu, ke li, don Quijote, ne povis eviti agi, kiel li agis. Ankaŭ Sancho diris al la ekleziulo:

—Se la sinjoroj kompanoj viaj volus scii, kiu kuraĝa kavaliro metis ilin en tiel mizeran staton, diru al ili, ke li estas la fama

don Quijote de La Mancha, alinome la Kavaliro de la Trista Mieno.

La bakalaŭro foriris kaj don Quijote demandis al Sancho, kial li nomis lin Kavaliro de la Trista Mieno kaj ĝuste en tiu momento?

—Ĝuste pro tio, ke mi longe vin rigardis ĉe la lumo de la torĉo de la povra sinjoro, kaj, verdire, via moŝto prezentas en la lasta tempo la plej priplorindan mienon de la mondo, kaŭze, eble, de la laciĝo post la batalo aŭ de la manko de la dentoj kaj molaroj.

—Ne tial —respondis don Quijote—. Okazas, ke la sorĉisto, kies tasko estas skribi la historion de miaj faroj, certe pensis konvena, ke mi uzu ian titolon, kiel la kavaliroj de la pasintaj epokoj; unu nomiĝis «de la Arda Glavo»; alia «de la Puceloj»; alia «de la Fenikso»; alia «de la Unikorno»; alia «de la Grifo»; alia «de la Morto» kaj sub tiaj nomoj kaj insignoj oni konis ilin ĉie en la mondo. Mi asertas do, ke la sama sorĉisto sendube metis nun al vi en la kapon kaj sur la langon la ideon nomi min la Kavaliro de la Trista Mieno kaj tian nomon mi uzos jam de hodiaŭ; kaj por ke ĝi konformu al mi pli bone, mi havas la intencon pentrigi sur la ŝildo tre tristan vizaĝon.

—Ne valoras la penon elspezi tempon kaj monon por pentri tian vizaĝon —diris Sancho—. Sufiĉas nur, ke via moŝto montru la vian al la personoj vin rigardantaj, kaj ili sen bezono de pentraĵo aŭ ŝildo tuj nomos vin «de la Trista Mieno». Mi certigas vin, eĉ se mi iom troigas por ŝerceti, ke la malsato kaj la manko de molaroj igas vian vizaĝon tiel aĉa, ke tute superfluas la trista pentraĵo.

Don Quijote ridis je la ŝerco de Sancho, sed havis la firman intencon uzi tian nomon, de kiam li pentrigos sur sia ŝildo la

vizaĝon de li imagitan.

—Ŝajnas, Sancho —li diris—, ke mi devas konsideri min ekskomunikita, ĉar mi traktis sanktaĵojn per violenta mano, *justa illud*: «si quis suadente diabolo»^[89] ktp, kvankam mi bone scias ke ne la manojn, sed la pikstangon mi uzis. Cetere mi kredis ataki, ne pastrojn aŭ propraĵojn de la Eklezio, kiun mi respektas kaj adoras, kiel kristano kaj fidela katoliko, sed fantomojn kaj transtombajn aperojn. Kaj min konsolas ankaŭ tio okazinta al Cid Ruy Díaz, kiam li rompis la seĝon de iu reĝa ambasadoro^[90] en la ĉeesto de lia papa moŝto, kaj ĉi lasta ekskomunikis lin pro tia faro; kvankam la brava Ruy Díaz, agante tiel, kondukis kiel viro honora kaj kuraĝa.

Kiel dirite, la bakalaŭro jam foriris, kaj don Quijote deziris vidi, ĉu en la portilo kuŝas la korpo de la mortinto aŭ nur la skeleto, sed Sancho oponis, dirante:

—Sinjoro, vi eliris el ĉi danĝera aventuro, kun malpli da damaĝo ol el la ceteraj. Tiuj viroj forkuris venkite, sed povus okazi, ke ili, vidante sin batitaj de nur unu persono kaj sentante pro tio honton kaj furiozon, retrovus sian kuraĝon kaj venus reguligi kun ni la kontojn. La azeno havas konvenan ŝarĝon, la montaro proksimas kaj la malsato premas, do plej saĝe estas dece retiriĝi per vigla takto de la piedoj, kaj, kiel oni diras, «la mortintaj homoj putru, kaj la vivaj plu sin nutru».

Senplie li surazeniĝis, kaj diris al sia sinjoro, ke li sekvu lin. Ŝajnis al don Quijote, ke la ŝildisto pravas, do sen respondi ion, li faris, kiel petite. Ili marŝis kelkan tempon inter du montetoj kaj fine alvenis al vasta kaj fermita valo, kie ili deseliĝis. Sancho malŝarĝis la azenon, ja li kaj don Quijote, kuŝante sur la verda herbo, matenmanĝis, tagmanĝis, kolazionis kaj vespermanĝis per unu fojo kaj kun la malsato

kiel spico, kaj kontentigis la stomakon dank' al la viktualio, kiun la sinjoroj ekleziuloj —ĝenerale tre sinregalemaj— portis sur la ŝarĝomulo. Sed alia misfortuno trafis ilin, kaj Sancho rigardis ĝin la plej mava: ili malhavis ne nur vinon, sed eĉ akvon por trinki, kaj la soifo ilin torturis. Sancho, vidante, ke la loko kie ili troviĝas, riĉas je freŝa kaj densa herbo, diris kion oni legos en la sekvanta ĉapitro.

[88] Ŝajne, temas pri preteratento de Cervantes. Don Quijote efektive ne rompis sian ĵuron.

[89] Latine, komencaj vortoj de la kanono, kiu ekskomunikas la agresintojn de pastro aŭ monaĥo.

[90] En la romancaro pri Cid Ruy Díaz, oni rakontas, ke li vidis en Romo, ke la seĝo de la reĝo de Francujo staras apud la seĝo de la papo, dum tiu de lia propra reĝo kaj sinjoro staras sur malsupra nivelo. Tiam Cid Ruy Díaz renversis per piedfrapo la seĝon francan kaj suprenmetis la hispanan.

Ĉapitro 20

Pri la neniam antaŭe vidita nek aŭdita aventuro kiun, kun malpli da danĝero ol iu ajn alia faro plenumita de kavaliro en la mondo, efektivigis la kuraĝa don Quijote de La Mancha

—La humido de la herboj atestas, sinjoro, ke ĉi-proksime troviĝas fonto aŭ rojo; konvenus do iri iom pli antaŭen, ĉar certe ni renkontos lokon, kie ni povos kontentigi ĉi neelteneblan soifon, kiu sendube kaŭzas pli grandan torturon ol la malsato mem.

Don Quijote trovis la sugeston bona. Li prenis la ĉevalon je la brido; Sancho, metinte la restaĵojn de la vespermanĝo sur la azenon, prenis ĝin je la kondukiloj, kaj la du viroj komencis iri sur la herbejo blindulmaniere, ĉar la nokta tenebro tiel densis, ke ili vidis nenion. Ili faris apenaŭ ducent paŝojn, kiam aŭdiĝis granda bruo de akvo, kiel tumulto de torento falanta inter altaj kaj grandaj rokoj. Tiu sono forte ĝojigis ilin kaj, haltinte por aŭskulti de kiu direkto ĝi venas, ili aŭdis subite alian bruegon, tian, ke ilia kontento ĉe la sono de la akvo vaporiĝis, speciale la kontento de Sancho, kiu havis timidon kaj timeman naturon.

Mi diru do, ke la bruon faris taktaj batoj kaj feraj kaj ĉenaj grincoj, kiuj, kombinitaj kun la furioza tondro de la akvo terurus ĉiun homon, krom don Quijote. Kiel dirite, la nokto estis obskura, kaj la du viroj enpaŝis inter altajn arbojn, kies folioj, movataj de mola vento, faris mildan sed maltrankviligan sonon. Tiel do, la soleco, la loko, la obskuro, la bruo de la akvo kaj susuro de la folioj kaŭzis hororon kaj timon, des pli, kiam ili vidis, ke la batoj ne ĉesas, nek la

vento kvietiĝas, nek la aŭroro alvenas. Al ĉio ĉi oni aldonu, ke ili ne sciis, kie ili troviĝas. Sed don Quijote kun sia konstante sentima koro saltis sur la ĉevalon, ŝirmis sin per la ŝildo, horizontaligis la pikstangon kaj diris:

—Amiko Sancho, sciu, ke laŭ la volo de la ĉielo mi naskiĝis en ĉi fera epoko nia, por revivigi la epokon de la oro aŭ, kiel oni ordinare diras, la or-epokon. La destino rezervis al mi la danĝerojn, la grandajn farojn, la kuraĝajn heroaĵojn. Mi diras ankoraŭfoje, ke dank' al mi, reviviĝos la kavaliroj de la Tablo Ronda, la dek du paruloj de Francujo kaj la naŭ famuloj, kaj mi faligos en la forgeson Platir, Tablante, Olivante, Tirante, la Kavaliron de la Suno, Belianís kaj la tutan gregon da famaj kavaliroj de la pasinta tempo, farante en la nuna tiel grandajn kaj eksterordinarajn aferojn kaj prodaĵojn, ke mi eklipsos iliajn plej glorajn heroaĵojn. Vi bone rimarkas, lojala kaj fidela ŝildisto, ke la tenebro de ĉi nokto, ties stranga silento, la surda kaj konfuza murmuro de la arboj, la senĉesa batado vundanta al ni la aŭdon, la terura bruvo de la akvo, kiun ni venis serĉi, kaj kiu ŝajnas torente kaskadi de la montoj de la luno, sufiĉus, kune aŭ unuope, por vekti timon, teruron kaj hororon en la brusto de Marso mem, des pli en la personoj ne kutimiĝintaj al ĉi tiaj eventoj kaj aventuroj. Nu, ĉio ĉi, kion mi pentras al vi, spronas kaj instigas mian kuraĝon, kaj en mia brusto la koro krevas de la deziro entrepreni ĉi aventuron, kiom ajn riska ĝi montriĝos. Tiel do, streĉu iom pli la ventrobendon de Rocinante, gardu vin Dio, atendu min ĉi tie ĝis tri tagoj kaj, se en tiu tempo mi ne revenos, iru al nia vilaĝo kaj de tie, farante servon kaj favoron al mi, iru al El Toboso kaj diru al la senkompara sinjorino mia Dulcinea, ke ŝia sklavo-kavaliro mortis entreprenante aferojn, kiuj povus igi lin inda je ŝi.

Aŭdinte sian mastron tiel paroli, Sancho komencis plej amare plori kaj diris:

—Sinjoro, mi ne scias, kial vi volas entrepreni tiel teruran aventuron. Nun estas nokto, oni ne vidas nin, ni povas devii de la vojo kaj eskapi de la danĝero, eĉ se farante tiel, ni ne trinkos akvon dum tri tagoj. Kaj, ĉar oni nin ne vidas, oni ne povus akuzi nin pri malkuraĝo. Des pli, ke mi aŭdis prediki la pastron de nia vilaĝo (vi konas lin tre bone), ke «kiu serĉas danĝeron, en ĝi pereas». Do, ne konvenas tenti la providencon, entreprenante sensencan aventuron, el kiu nur mirakle ni saviĝus; la ĉielo jam faris sufiĉe da mirakloj al via moŝto ŝparante vin esti bernata kiel mi, kaj igante vin la venkinto nedamaĝita kaj sendifekta super tiom da malamikoj viaj, kiuj eskortis la kadavron. Kaj se ĉi argumentoj nek tuŝas nek moligas vian duran koron, ĝi moliĝu, se vi pensas kaj kredas, ke apenaŭ via moŝto apartiĝos de mi, posedos min tia timego, ke mi donos mian animon al la unua diablo ĝin petonta. Mi eliris el mia vilaĝo kaj forlasis mian edzinon kaj filojn por servi vian moŝton, kredante, ne perdi, sed gajni. Same kiel la monavido fine rompas la sakon, tiel ĝi rompis ankaŭ mian esperon, ĉar, kiam mi plej forte esperis akiri la damnitan kaj favan insulon, kiun via moŝto tiel ofte promesis al mi, mi vidas, ke anstataŭe, vi volas lasi min sola en ĉi loko tiel dista de la homoj. Je la nomo de Dio, sinjoro, ne traktu min tiel senkonsidere, kaj se via moŝto tamen insistas plenumi ĉi aventuron, tion prokrastu almenaŭ ĝis la manteniĝo. Laŭ la scienco, kiun mi lernis paŝtante, de nun ĝis la mateniĝo pasos ne pli ol tri horoj, ĉar la faŭko de la ursino troviĝas super nia kapo,^[91] kaj en la noktomezo ĝi vidiĝas en linio kun la liva brako.

—Kiel vi, Sancho, povas vidi, kie kuŝas tia linio, aŭ kie troviĝas la faŭko kaj la kapo, pri kiuj vi parolas? La nokto estas tiel nigra, ke en la tuta ĉielo brilas eĉ ne unu stelo.

—Jes, vi pravas. Sed la timo havas multe da okuloj, kaj, se ĝi vidas eĉ sub la teron, tiom pli supren, en la ĉielon. Cetere oni facile komprenas, ke ne estos longe de nun ĝis la mateniĝo.

—Longe aŭ ne longe —respondis don Quijote—, neniam oni diros pri mi, ke larmoj kaj preĝoj deturnis min de mia kavalira devo. Do mi petas vin, Sancho, ne plu paroli. Dio inspiris al mi en la koron entrepreni ĉi senegalan kaj danĝeran aventuron, kaj Li prizorgos min kaj konsolos vian aflikton. Vi nur firme streĉu la ventrobendon de Rocinante kaj restu ĉi tie. Viva aŭ morta, mi baldaŭ revenos.

Sancho, vidante ke la decido de lia mastro estis nefleksebla, kaj ke larmoj, preĝoj kaj konsiloj neniel lin impresis, decidis helpi sin per ruzo, por, se eble, igi lin atendi ĝis la mateniĝo. Tiel do, kiam li streĉis la ventrobendon de Rocinante, li kunligis lerte kaj nerimarkate la frontajn piedojn de la ĉevalo, per la kondukiloj de sia azeno, tiel, ke kiam don Quijote volis ekiri, li ne povis, ĉar Rocinante movis sin apenaŭ per saltetoj. Sancho Panza, vidante ke lia artifiko sukcesis, diris:

—Nu, Sinjoro, miaj larmoj kaj preĝoj kortuŝis la ĉielon, kaj certe ĝi ordonis, ke Rocinante ne moviĝu. Kaj se vi insistos urĝi kaj sproni ĝin, tio egalos provoki la providencon kaj, kiel oni diras, batadi la venton.

Ĉe tio don Quijote desperis kaj ju pli li spronis la ĉevalon, des malpli li povis movi ĝin. Tiel do, ne suspektante la ekziston de la ligilo, li decidis trankviliĝi kaj atendi, aŭ ĝis la aŭroro, aŭ ĝis Rocinante ekiros, ĉar li sendube kredis, ke ĝian senmovecon kaŭzas, ne ruzaĵo de Sancho, sed io ajn alia. Do li diris:

—Ĉar okazas, Sancho, ke Rocinante vere ne povas moviĝi, mi atendos ĉi tie ĝis la aŭroro ekridos, kvankam mi priploras la tardon de ĝia apero.

—Ne necesas plori —respondis Sancho—. Mi distros vin per rakontoj ĝis la mateniĝo, se okaze vi ne volas deseliĝi kaj

iom dormi sur la verda herbo, laŭ la kutimo de la vagantaj kavaliroj, por senti vin malpli laca, kiam la tago venos, kaj vi frontos la senkomparan aventuron, kiu vin atendas.

—Kion vi diras? Deseliĝi? Dormi? Ĉu mi estas do unu el la kavaliroj emaj ripozi meze de danĝeroj? Vi mem dormu, ĉar vi naskiĝis dormema, aŭ faru laŭvole. Mi tenos min al la devo de mia profesio.

—Via moŝto ne koleriĝu —diris Sancho—. Mi ne volis ĉagreni vin.

La ŝildisto pli proksimiĝis al li, metis unu manon sur la frontan pomelon de la selo de Rocinante, kaj la alian su la postan, tiel, ke li sin premis al la liva femuro de sia mastro kaj ne kuraĝis apartiĝi de li eĉ unu fingron: tiel multe teruris lin la batoj sonantaj ankoraŭ en regula sinsekvo.

Don Quijote petis la ŝildiston rakonti historion por distri lin, kiel li promesis. Al tio Sancho respondis, ke tion li farus, se la timo al la bruo lasus lin.

—Malgraŭ ĉio —li aldonis—, mi provos diri al vi historion, kaj se mi sukcesos rakonti ĝin sen interrompo, ĝi estos la plej bona historio de la mondo. Via moŝto atentu, mi jam komencas: al ni venu bon' konstanta, kaj malbono al persono ĝin serĉanta; okazis foje iam... Rimarku, sinjoro, ke la antikvuloj komencis siajn historiojn, ne laŭplaĉe, sed per la jena sentenco de Katono, la severa Romano: «venu malbono al persono ĝin serĉanta», kio konvenas al la nuna situacio, kiel ringo al fingro, ĉar tio signifas, ke vi, sinjoro, devus teni vin trankvila, serĉi nenien la mavon kaj sekvi alian vojon, tial, ke nenio nin devigas resti ĉi tie meze de tiom da teruraĵoj.

—Daŭrigu vian rakonton, Sancho —diris don Quijote—, kaj lasu al mi, kiun vojon ni sekvos.

—Mi diras do, ke en vilaĝo de Extremadura iam vivis paŝtisto, pli ĝuste, kapristo, ĉar li gardis kaprojn, kaj ĉi paŝtisto aŭ kapristo de mia rakonto nomiĝis Lope Ruiz, kaj ĉi Lope Ruiz enamiĝis al paŝtistino nomata Torralba, kaj ĉi paŝtistino nomata Torralba estis filino de riĉa gregoposedanto; kaj ĉi riĉa gregoposedanto...

—Se vi tiel diros la historion, Sancho, ripetante du fojojn kion vi rakontas, vi ne finos ĝin ĝis du tagoj. Diru ĝin normale, kiel racia persono, aŭ diru nenion.

—Same kiel mi rakontas —respondis Sancho—, oni rakontas en mia lando. Mi ne scias alimaniere, kaj vi ne tre ĝentilas, petante min akiri novajn kutimojn.

—Rakontu laŭ via plaĉo, kaj ĉar la Fato volas, ke mi aŭskultu vin, bonvolu daŭrigi.

—Nu, mia kara mastro, kiel menciite, ĉi kapristo enamiĝis al Torralba, paŝtistino plumpa, de vinagra karaktero kaj iom vireska, ĉar ŝi havis iomon da lipharoj. Mi nun memoras ŝin, kvazaŭ mi ŝin refoje vidus.

—Ĉu vi do konas ŝin? —demandis don Quijote.

—Mi ne —respondis Sancho—. Sed la homo rakontinta al mi ĉi historion asertis, ke ĝi estas tiel vera kaj aŭtenta, ke, kiam mi ripetus ĝin al aliaj, mi povus ĵuri, ke mi mem vidis ĉion. Nu, la tagoj venis kaj pasis, kaj la diablo, kiu neniam dormas kaj ĉion implikas, turnis la amon de la kapristo al Torralba en abomenon kaj misvolon; tion motivis, kiel malicaj langoj diris, ke li ĵaluzis pro kelkaj faroj ŝiaj transirintaj la limon de la deco kaj eĉ de tio, kion oni ne povas permesi. Kaj de tiam la kapristo abomenis ŝin tiel intense, ke, por eviti ŝin, li decidis foriri ien ajn, kie liaj okuloj ne plu vidus ŝin. Sed, kiam ŝi vidis sin disdegnata de Lope, Torralba denove enamiĝis al li, eĉ pli forte ol antaŭe.

—Tio kuŝas en la naturo de la virinoj —diris don Quijote—. Ili disdegnas siajn sekvantojn kaj amas la virojn, kiuj ilin evitas. Daŭrigu, Sancho.

—Okazis —diris Sancho—, ke la paŝtisto efektivigis sian ideon. Pelante la kaprojn, li pasis tra la kampoj de Extremadura por iri al la reĝolando de Portugalujo. Torralba sciiĝis pri lia plano, sekvis lin de fore, marŝante per nudaj piedoj kun pilgrima bastono en la mano kaj kun dusako ĉirkaŭ la kolo. Laŭ la famo, en la dusako kuŝis peco de spegulo, parto de kombilo kaj mi ne scias kia skatoleto da ŝminko por la vizaĝo. Sed, kiom ajn ŝi portis, mi ne opinias tion notinda. Mi nur diras, ke, laŭdire, la kapristo alvenis kun sia grego al la rando de la rivero Guadiana, kiu tiam tre ŝvelis kaj preskaŭ superbordiĝis. Kaj sur la bordo, kie li staris, vidiĝis nek boato, nek pramo, nek homo, kiu povus transirigi lin kaj lian gregon al la alia bordo. Tio lin afliktis, ĉar li rimarkis, ke Torralba proksimiĝas kaj ŝi tedegus lin per larmoj kaj suplikoj. Sed tiom li rigardis ĉien, ke finfine li distingis fiŝiston, ĉe kies flanko floris boato tiel eta, ke ĝi povus enteni nur unu homon kaj unu kapron. Tamen Lope parolis kun la fiŝisto, aranĝis kun li, ke tiu transigu lin kaj liajn tricent kaprojn. La fiŝisto do eniris en la boaton kaj transportis unu kapron; revenis kaj portis alian; denove venis kaj refoje portis alian. Via moŝto ne forgesu kalkuli la nombron de la kaproj, kiujn la fiŝisto transigas, ĉar, eĉ se nur unu eskapos el via memoro, la rakonto finiĝos, kaj ne eblos diri ion plian pri ĝi. Mi daŭrigas do kaj diras, ke la haltejo de la boato en la transa bordo plenis de glitiga ŝlimo, sekve al la fiŝisto kostis longan tempon iri kaj reveni. Tamen li ĉiam revenis por transporti alian, kaj alian, kaj alian...

—Nu, imagu, ke ĉiuj kaproj jam troviĝas transe —diris don Quijote—. Ne tiel iru kaj revenu, ĉar vi ne povos porti ilin ĝis unu jaro.

—Kiom da ili pasis ĝis nun? —demandis Sancho.

—Kiel mi scius, je la diablo?

—Ĉu mi ne avertis vin kalkuli la nombron? Nu, la rakonto finiĝis, je Dio. Ne eblas daŭrigi ĝin.

—Ĉu vere? —respondis don Quijote—. Ĉu scii kiom da kaproj iris al la alia bordo estas tiel esenca al la rakonto, ke vi ne povas daŭrigi ĝin, se oni eraras en la kalkulo?

—Efektive, sinjoro, mi ne povas —diris Sancho—, ĉar, tuj kiam mi demandis al vi, kiom da kaproj pasis, kaj vi respondis, ke vi ne scias, en la sama momento eskapis el mia memoro la cetero, tre bona kaj amuza, de la rakonto.

—La historio do finiĝis? —demandis don Quijote.

—Tiel certe, kiel finiĝis la vivo de mia patrino.

—Nu, vere, vi diris unu el la plej strangaj rakontoj imageblaj. Kaj neniam en la mondo ekzistis tia maniero rakonti kaj ĉesigi historion, kvankam mi atendis de via talento nenion alian. Cetere tiuj senĉesaj bategoj eble konfuzis al vi la kapon.

—Povas esti —diris Sancho—, sed rilate mian rakonton, nenio pli direblas; ĝi finiĝas, kie oni komencas erari en la kalkulado de la kaproj.

—Ĝi finiĝu, kie ajn ĝi volas —respondis don Quijote—. Kaj ni vidu, ĉu Rocinante povas jam moviĝi.

Li denove spronis la ĉevalon, kaj ĝi refoje saltetis, sed tuj ĉesis movi sin: tiel forte Sancho ĝin ligis. Ĉe tio, aŭ pro la frido de la mateniĝo jam venanta, aŭ pro tio, ke li vespermanĝis eble ion laksigan, aŭ (pli probable) pro la

natura sinsekvo de la organaj funkcioj, Sancho sentis la neceson kaj la urĝon fari kion neniu alia povus fari por li. Sed lian koron premadis tiel granda timo, ke li ne kuraĝis apartiĝi de sia mastro eĉ unu harlarĝon. Tamen estis nepenseble ne fari la farendaĵojn, do sekvante mezan vojon inter la neceso kaj la timo, li retiris la dekstran manon de la posta pomelo de la selo de Rocinante kaj lerte kaj silente malstreĉis la glitan maŝon de la zono tenanta, sen helpo de io ajn alia, lian pantalonon, kiu sekve defalis kaj implikiĝis ĉe liaj piedoj. Poste, kiel li povis, li suprentiris sian ĉemizon kaj elmetis en la aero la du gluteojn, kiuj estis ne etaj. Li kredis, ke per tio li faris jam ĉion necesan por eltiri sin de tiel terura embaraso kaj angoro, sed tiam li frontis alian eĉ pli gravan problemon: li timis, ke li ne povus koti sen fari ian bruon, do li komencis kunpreni la dentojn kaj kuntiri la korpon, retenante la spiron, kiom li povis; sed, malgraŭ tiaj antaŭzorgoj, bedaŭrinde li ne sukcesis eviti fari iometon da bruo tre diferenca de la bruo teruranta lin. Don Quijote aŭdis lin kaj demandis:

—Kio estas tia rumoro, Sancho?

—Mi ne scias, sinjoro —respondis la ŝildisto—. Certe temas pri io nova, ĉar aventuroj kaj misfortunoj neniam venas solaj.

Li refoje provis sian sorton, kun tia sukceso, ke, sen plia bruo, li liberigis sin de la ŝarĝo kaŭzinta al li tiom da aflikto. Don Quijote havis, ne nur bonan orelon, sed ankaŭ delikatan flarsenton, kaj tial, ke Sancho staris alkrampita al li, la fetoro, leviĝanta rekte, ne povis ne tuŝi la nazon de nia kavaliro. Kaj apenaŭ li sentis la odoraĉon, li rapidis ĝin eviti, premante la nazon per du fingroj kaj kun tono iom obtuza diris:

—Ŝajnas al mi, Sancho, ke vi havas timegon.

—Jes —respondis la ŝildisto—, sed, kial vi speciale rimarkas tion ĝuste nun?

—Ĉar ĝuste nun vi odoras, kaj ne je ambro —respondis don Quijote.

—Povas esti. Sed kulpas, ne mi, sed via moŝto, tial, ke vi trenas min al tiel strangaj lokoj en tiel nekonvenaj horoj.

—Apartiĝu tri aŭ kvar paŝojn, amiko —diris don Quijote, sen retiri ankoraŭ la fingrojn de la nazo—, kaj de nun pli atentu vian propran personon kaj ankaŭ la respekton, kiun vi ŝuldas al mi. Sendube mi traktas vin tro familiare, kaj de tio venas via ofenda trosenĝeno.

—Mi vetas —respondis Sancho—, ke via moŝto pensas, ke mi faris nedecaĵojn.

—Preferindas ne plu tuŝi tian aferon, amiko Sancho —diris don Quijote.

Tiel babilante, la mastro kaj la servisto pasigis la nokton, kaj kiam Sancho vidis, ke la mateniĝo rapide proksimiĝas, li tre singarde malligis la ĉevalon kaj suprentiris al si la pantalonon. Tiel baldaŭ kiel Rocinante vidis sin libera, ĝi komencis revigliĝi, kaj, kvankam ĝi ne havis fortan naturon, ĝi batis la hufojn kontraŭ la grundon, ĉar baŭmi (Rocinante pardonu al ni la diskonigon) ĝi ne kapablis. Don Quijote, vidante do, ke la ĉevalo moviĝas, rigardis tion bona aŭguro kaj kredis, ke tio signas, ke li devas jam entrepreni la danĝeran aventuron.

Ĉe tio la aŭroro ekbrilis, la objektoj jam klare vidiĝis, kaj don Quijote rimarkis, ke li troviĝas inter altaj kaŝtanarboj, kies ombro estas tre nigra. Li sentis ankaŭ, ke la bruego ne ĉesas, sed li ne povis distingi ankoraŭ ĝian kaŭzon. Li spronis la ĉevalon sen plia prokrasto, adiaŭis la ŝildiston, ordonis lin

atendi tie ĝis tri tagoj, kiel li jam pli frue petis de li, kaj aldonis, ke se li ne revenos en tiu tempo, tio okazos, ĉar Dio disponos, ke li pereu en tiel danĝera aventuro. Li denove menciis la mesaĝon, kiun Sancho devus porti al lia sinjorino Dulcinea; kaj rilate la salajron, don Quijote petis la ŝildiston ne zorgi, ĉar li jam faris testamenton antaŭ ol forlasi la vilaĝon, kun la klaŭzo rezervi al la ŝildisto sumon proporcian al la tempo de lia servado. Tamen, se el tia danĝero Dio eltirus lin sendifekta kaj ne damaĝita, Sancho povus tute certi kaj recerti ricevi la promesitan insulon. La ŝildisto denove ekploris, aŭdante la korŝirajn vortojn de sia mastro, kaj decidis en si ne forlasi lin ĝis la definitiva fino de tiu aventuro. El la larmoj kaj el la laŭdinda decidiĝo de Sancho, la aŭtoro de ĉi historio konkludas, ke la ŝildisto certe naskiĝis honestulo kaj estis almenaŭ olda kristano.^[92] Lia emocio kortuŝis lian mastron, sed ne ĝis la ekstremo igi lin montriĝi sentiva; kontraŭe, kaŝante sian senton, kiom li povis, don Quijote ekrajdis al la loko de kie, ŝajne, venis la bruo de la akvo kaj la bategoj sinsekvaj. Sancho iris post li piede kaj, kiel kutime, gvidis per la kondukiloj la azenon, konstantan kompanon sian en bonaj kaj mavaj cirkonstancoj.

Post ol ili iris ioman distancon inter la dens-ombraj kaŝtanarboj, ili alvenis al herbejo kuŝanta ĉe la piedo de altaj rokoj, de kies supro tumultis suben grandega maso da akvo. Ĉe la piedo de la rokoj staris kelkaj domaĉoj, pli similaj al ruinoj ol al konstruoj, kaj don Quijote kaj la ŝildisto rimarkis, ke de ili venas la senĉesa bategado.

Rocinante teruriĝis pro la tumulto de la akvo kaj pro la bategoj, sed don Quijote, trankviligante la ĉevalon, proksimiĝis iom post iom al la domoj, per la tuta koro rekomendis sin al sia sinjorino, petis ŝin favori lin en tiel danĝera entrepreno kaj tasko, kaj li ankaŭ preĝis al Dio, ke Li ne forgesu lin. Sancho ne apartiĝis de li kaj streĉis la kolon,

kiom li povis, por plej atente alrigardi, inter la kruroj de Rocinante, ĉu fine vidiĝos tio, kio kaŭzis al li tiel profundan angoron kaj timon. Ili faris proksimume cent pliajn paŝojn, kaj, kiam ili rondis angulon de la vojo, aperis klara, evidenta kaj nekonfuzebla la kaŭzo de la surdiga, kaj por ili horora, bategado, kiu teruris kaj angorigis ilin tiel forte dum la tuta nokto. Kaj temis —se tio ne ĝenas vin, kara leganto— pri ses grandaj ful-marteloj, kies alternaj movoj faris la bruegon.

Kiam don Quijote konstatis, pri kio temas, frapis lin surprizo kaj honto. Sancho lin rigardis, kaj vidis lin kun la kapo klinita, en stato de konfuziteco. Don Quijote ankaŭ rigardis la ŝildiston kaj vidis, ke liaj vangoj pufiĝas kaj lia buŝo tordiĝas, kvazaŭ Sancho estus tuj krevonta pro rid-eksplodo; kaj malgraŭ sia propra melankolio, don Quijote ne povis ne ridi je la mieno de la ŝildisto, kiu, vidante, ke lia mastro komencis, ellasis tiajn ridegojn, ke, por ne eksplodi, li premis al si la flankojn per la pugnoj. Kvar fojojn li ĉesigis kaj kvar fojojn ripetis la ridon kun la sama impeto; ĉe tio don Quijote jam komencis koleri, des pli, kiam la ŝildisto diris kun sarkasmo:

—«Amiko Sancho, sciu, ke mi naskiĝis en ĉi fera epoko, por revivigi la epokon de la oro. La destino rezervis al mi la danĝerojn, la grandajn farojn, la heroaĵojn».

Kaj tiel li ripetis ĉion, aŭ preskaŭ ĉion, kion diris don Quijote, kiam tiu aŭdis por la unua fojo la terurajn batojn.

Vidante do, ke Sancho mokas lin, don Quijote tiel ĉagreniĝis kaj furiozis, ke li levis la pikstangon kaj donis al la ŝildisto du tiajn batojn, ke, se ili estus trafintaj lian kapon, anstataŭ lian dorson, don Quijote liberiĝus de la devo pagi lian salajron al li, se ne al liaj heredontoj. Sancho, vidante ke lia ŝerco donas tiel aĉan rezulton, kaj timante, ĉu lia mastro rebatos ankoraŭfoje, diris tre humile:

—Trankviliĝu via moŝto, temis nur pri simpla ŝerco.

—Nu, ĉar vi ŝercas, mi seriozas —respondis don Quijote—. Diru, sinjoro gajulo, ĉu vi pensas, ke, se mi estus trovinta alian aventuron, anstataŭ ful-martelegojn, mi ne montrus la necesan kuraĝon por entrepreni kaj fini ĝin? Ĉu mi devus (malgraŭ ke mi estas kavaliro) koni la sonojn kaj distingi, ĉu ili estas aŭ ne de ful-marteloj? Des malpli, ke mi ne vidis tiajn martelojn en mia tuta vivo, dum vi certe vidis ilin, ĉar vi estas mizera kampulo naskita kaj kreskinta inter tiaj objektoj. Turnu la ses martelojn en ses gigantojn, ĵetu ilin al mia barbo, unu post la alia, aŭ kune, kaj, se mi ne sternos ilin sur ties spinon, moku min laŭplaĉe.

—Sufiĉas, sinjoro —respondis Sancho—. Mi konfesas, ke mi gajis pli ol necese. Sed nun, kiam ni jam interpaciĝis (kaj Dio volu eltiri vin el ĉiuj venontaj aventuroj, tiel sendifekta kaj ne damaĝita kiel el la ĵusa), ĉu ne estas ridinda kaj rakontinda la timo, kiun ni havis? Almenaŭ mi timis, ne vi, ĉar mi scias, ke via moŝto tute ne konas timon aŭ teruron.

—Vere, kio okazis al ni esta ridinda —respondis don Quijote—, sed ne rakontinda, ĉar ne ĉiu posedas sufiĉan saĝon por ĝuste vidi la aferojn.

—Almenaŭ via mosto ĝuste vidis, kiam vi celis mian kapon per la lanco; feliĉe vi trafis min sur la dorson, dank' al Dio kaj al tio, ke mi rapide kliniĝis. Sed tio ne gravas; la kaŝitaj intencoj ĉiam riveliĝas, kaj cetere mi aŭdis diri, ke, «kiu amas sian filon, baldaŭ lin punas». Krome la grandaj sinjoroj kutimas, post ol ili skoldas serviston, donaci al li kuloton. Mi ne scias kion ili donacas post regalado per vergoj, kvankam mi imagas, ke la vagantaj kavaliroj donas aŭ insulojn, aŭ reĝolandojn sur firma tero.

—La kuboĵ de la sorto povas ĝuste ruliĝi —diris don Quijote—, kaj ĉiu vorto via pruviĝi vera. Kaj pardonu tion, kio okazis, ĉar vi estas sufiĉe saĝa por scii, ke oni ne kapablas regi la unuajn impulsojn. Sed atentu la jenon: de nun vi devas ne tiel ofte nek tiel multe alparoli min. Mi neniam legis ankoraŭ en la kavaliraj libroj (kaj mi legis senfinan nombron da ili), ke ia ŝildisto parolis kun sia mastro tiom, kiom vi kun la via. Vere ni ambaŭ kulpas; vi, ĉar vi apenaŭ montras respekton al mi; mi, ĉar mi ne igas min pli respektata. Sciu, ke Gandalín, ŝildisto de Amadís de Gaŭlio, estis grafo de la Firma Insulo kaj ĉiam parolis al sia mastro kun la ĉapo en la mano kaj kun la kapo kaj la korpo riverence klinitaj laŭ la turka maniero. Kaj kion diri pri Gasabal, ŝildisto de don Galaor? Li estis tiel lakona, ke por igi nin kompreni la perfektecon de lia mirinda silentado, la aŭtoro nomas lin nur unu fojon en la tuto de tiu longa kaj vera historio. El ĉio ĉi konkludu, Sancho, ke necesas teni ian distancon inter mastro kaj subulo, inter sinjoro kaj servisto, inter kavaliro kaj ŝildisto. Sekve, jam de nun vi devas kondukti kun pli da respekto kaj sen ŝercoj, ĉar, kiel ajn mi kolerus kontraŭ vi, ĉiam la kruĉo suferus la rompojn. La rekompencoj kaj favoroj, kiujn mi promesis al vi, venos siatempe, kaj, se ne, almenaŭ vian salajron vi ne perdos, kiel mi jam diris.

—Via moŝto saĝe parolas —diris Sancho—, sed mi dezirus scii, se hazarde ne venos la tempo de la rekompencoj, kaj mi bezonos helpi min nur per la salajro, kiom da mono lukris ŝildisto de vaganta kavaliro en la antikva tempo, kaj ĉu oni dungis lin por monatoj aŭ tagoj da laboro, kiel oni kutimas kun la masonistoj.

—Mi kredas —respondis don Quijote—, ke tiaj ŝildistoj ĉiam laboris ne por salajroj, sed por favoroj. Tamen, en la sigelita testamento, kiun mi lasis ĉe mi, mi atribuis al vi salajron, antaŭzorgante kontraŭ ajna eventualo, ĉar mi ne scias, kiel

prosperos la kavalirismo en la mizeraj tempoj nunaj, kaj mi ne volus, ke, pro bagatelo, mia animo damniĝus en la transa mondo. Sciu, Sancho, ke ne ekzistas pli danĝera stato en la mondo ol la stato kavalira.

—Vi pravas —diris Sancho—, se konsideri, ke la nuraj batoj de ful-marteloj sufiĉis por alarmi kaj perturbi la koron de tiel kuraĝa kavaliro, kia vi estas. Cetere, mi certigas vin, ke de nun mi apertos la buŝon nur por honori mian mastron kaj naturan sinjoron, ne por ŝerci pri la aferoj de via moŝto.

—Tiamaniere vi vivos pace sur la surfaco de la tero — respondis don Quijote—, ĉar, post la patroj, la mastroj meritas plenan respekton.

[91] Temas pri la konstelacio Eta Ursino, laŭ kies diversaj pozicioj oni povas proksimume kalkuli, konsiderante la sezonon, kioma horo estas en la nokto.

[92] Sen antaŭuloj judaj aŭ mahometanaj.

Ĉapitro 21

Pri la akiro, en granda aventuro, de la riĉa kasko de Mambrino, kaj pri aliaj aferoj okazintaj al nia nevenkebla kavaliro

Ĉe tio komencis pluveti kaj Sancho volis sub la kovron de la domo de la ful-marteloj. Sed don Quijote sentis al ili tian abomenon, ĉar pro ili li ridindiĝis, ke li tute ne konsentis rifuĝi tien. Tiel do, la mastro kaj la ŝildisto sin deturnis dekstren kaj alvenis al vojo simila al tiu, kiun ili sekvis la antaŭan tagon. Iom poste don Quijote vidis surĉevalan viron, sur kies kapo brilegis io kiel oro. Tion rimarkante, nia kavaliro turnis sin al Sancho kaj diris:

—Ŝajnas al mi, Sancho, ke ĉiuj proverboj veras, ĉar ilin naskis la sperto mem, patrino de la sciencoj. Kaj aparte vera mortiĝas la proverbo: «Kiam unu pordo fermiĝas, alia apertiĝas». Mi tion diras, ĉar, se la pasintan nokton la Fortuno, mistifikante nin per la martelegoj, fermis al ni la pordon de la aventuro, kiun ni serĉis, nun la sama Fortuno plene apertas alian, por ke ni entreprenu pli bonan kaj pli certan aventuron. Kaj se mi ne sukcesos pasi tra ĉi pordo nuna, la kulpo estos nur mia, kaj mi povos ĝin atribui nek al mia nescio pri ful-marteloj, nek al la obskuro de la nokto. Mi tion diras, ĉar, se mi ne trompiĝas, tie venas homo, sur kies kapo sidas la kasko de Mambrino; kaj rilate ĉi kaskon mi faris la ĵuron, kiun vi konas.

—Zorgu kion vi diras, sinjoro, kaj ĉefe, zorgu kion vi faras — respondis Sancho—. Ne plaĉus al mi, ke aliaj ful-marteloj finus la taskon pisti al ni la cerbon.

—La diablo vin prenu, homo —diris don Quijote—. Kion komunan havas la kasko kun la ful-marteloj?

—Mi ne scias —respondis Sancho—, sed, se mi povus paroli nun tiel multe, kiel mi kutimis, mi certe sukcesus klarigi al vi la aferon, kaj via moŝto komprenus, ke vi trompiĝas.

—Kiel mi povus trompiĝi, kanajlo senskrupula? Ĉu vi ne vidas veni al ni unu kavaliron sur ĉevalo grizmakula kaj kun ora kasko sur la kapo?

—Mi vidas kaj distingas nur, ke unu viro rajdas sur azeno bruna, kia la mia estas, kaj ke sur la kapo li portas ion brilan.

—Nu, temas pri la kasko de Mambrino —diris don Quijote—. Apartiĝu kaj lasu min sola kun li. Vi vidas, ke, por ŝpari tempon, mi plenumos ĉi aventuron sen paroli eĉ unu vorton, kaj ke la kasko, kiun mi tiel forte deziradis, estos fine mia.

—Mi volonte apartiĝos, ne zorgu pri tio —respondis Sancho—. Sed Dio volu, ke el ĉi afero rezultu, ne ful-marteloj, sed mieloj.

—Mi jam avertis vin, frato, ke vi ne plu menciuj tion pri la ful-marteloj. Alie mi ĵuras je... mi ne diras je kio, ke mi elbatos el vi la animon.

Sancho silentiĝis, timante, ke lia mastro plenumus la ĵuron tiel draste kaj rekte ĵetitan al li.

Kaj nun jen la vero rilate al la kasko, la ĉevalo kaj la kavaliro, kiujn vidis don Quijote: en la tiea distrikto sidis du vilaĝoj proksimaj: unu tiel eta, ke ĝi havis nek apotekon nek barbiron, dum la alia havis ilin. Sekve la barbiro de la pli granda vilaĝo servis ankaŭ la etan, kie unu paciento bezonis sang-eltiron, kaj alia vilaĝano volis, ke oni aranĝu al li la barbon; tial la barbiro iris nun sur la vojo, portante ladan

barbo-pelvon. Sed laŭ volo de la Fato, tiam komencis pluvi, kaj la barbiro, por ke ne difektiĝu lia ĉapelo, sendube nova, metis al si sur la kapon la pelvon, kiu, ĉar ĝin oni bone elfrotis, brilegis en la distanco de pli ol unu mejlo. Li rajdis, kiel Sancho diris, sur bruna azeno; kaj ĝuste tial don Quijote prenis la azenon por griz-makula ĉevalo, la barbiron por kavaliro, kaj la pelvon por kasko, ĉar li tre facile akomodis kion li vidis al la ekstravagancoj de la kavaliraj libroj kaj al sia delira fantazio. Vidante la povran sinjoron pli proksima, don Quijote, sen diri eĉ unu vorton, kuris al li per la tuta energio eltirebla el Rocinante kaj, per la lanco en horizontala pozicio, atakis lin kun la intenco piki lin trae. Sed tuj antaŭ ol atingi lin, don Quijote diris, sen moderigi la furiozan impeton de Rocinante:

—Defendu vin, mizera, aŭ donu al mi propravole tion, kio nur al mi apartenas!

La barbiro, vidante ke tia fantomo subite kaj neatendite impetas kontraŭ li, ne trovis pli bonan rimedon por eviti la lancon, ol faligi sin de sur la azeno. Kaj apenaŭ li ektuŝis la grundon, per unu salto stariĝis pli rapide ol cervo, kaj tiel komencis peli siajn piedojn sur la ebenaĵo, ke eĉ la vento mem ne atingus lin. La pelvon li postlasis sur la grundo, don Quijote kontentiĝis je tio kaj diris, ke la pagano^[93] saĝe kondukis, imitante la kastoron,^[94] kiu, kiam la ĉasistoj ĝin sieĝas, fortranĉas de si per siaj propraj dentoj kion, kiel ĝi scias per sia natura instinkto, deziras ĝiaj persekutantoj. Don Quijote ordonis la ŝildiston levi la kaskon de sur la grundo.

—Je Dio, jen bona pelvo —diris Sancho, kiam li tenis ĝin en siaj manoj—. Certe ĝi valoras pli ol ok arĝentajn realojn.

Don Quijote ĝin prenis, metis ĝin al si sur la kapon kaj turnetis ĝin al ĉiu flanko, por ke ĝi konvene alĝustiĝu. Sed,

ĉar liaj provoj ne sukcesis, li rimarkis:

—La ulo, laŭ kies mezuro oni forĝis ĉi faman kaskon, sendube havis grandegan kapon; kaj, pli mave ankoraŭ, la duono de la kasko mankas.

Kiam Sancho aŭdis lin nomi la pelvon kasko, li ne povis ne ridi, sed, memorante la koleron de sia mastro, tuj silentiĝis.

—Kial vi ridas, Sancho? —demandis don Quijote.

—Ĉar mi imagas, kian kapegon certe havis la pagano posedinta ĉi kaskon, kiu cetere aspektas tute same kiel pelvo de barbiro.

—Ĉu vi scias, kion mi pensas, Sancho? —diris don Quijote—. Ke ĉi fama kaj ensorcita kasko falis pro stranga hazardo en la manojn de persono, kiu nek konis nek divenis ĝian veran valoron, kaj nesciante kion li faras, kaj vidante, ke ĝi konsistas el fajna oro, li fandis la duonon kaj ĝin vendis, kaj per la alia duono fabrikis ĉi tion, kio ŝajnas, kiel vi diras, pelvo de barbiro. Sed ne gravas kio ajn okazis, ĉar malgraŭ ĉio mi rekonis la kaskon. En la unua vilaĝo kun forĝisto mi igos ĝin refari tiel, ke ĝi egalos kaj eĉ superos la kaskon faritan de la reĝo de la forĝistoj por la reĝo de la bataloj. Dune mi portos ĝin kiel mi povos, ĉar pli valoras io ol nenio, des pli, ke ĝi sufiĉas ŝirmi min kontraŭ eventuala ŝtonfrapo.

—Jes, sed kondiĉe, ke oni ne pafu al vi la ŝtonojn per ĵetilo, kiel okazis en la batalo inter la du armeoj, kiam oni elbatis el vi la molarojn kaj frakasis la ujon kun la beninda pocio, kiu igis min vomi eĉ la hepaton.

—Mi ne tre zorgas pri la perdo de balzamo —diris don Quijote—. Mi konservas la recepton en la memoro.

—Ankaŭ mi —respondis Sancho—. Sed, se mi devus iam fari kaj denove trinki la pocion, prefere sonu jam mia lasta horo. Certe mi intencas neniam meti min en la okazon bezoni ĝin, evitante per mia tuta forto vundi, aŭ esti vundita. Ĉu oni bernos min denove, mi ne scias, ĉar oni ne povas preventi tiajn misfortunojn, kaj, se ili venas, eblas nur leveti la ŝultrojn, reteni la spiron, fermi la okulojn kaj lasi, ke la Fato kaj la bernantoj sendu nin, kien ajn ili volas.

—Vi ne estas bona kristano, Sancho —diris don Quijote—, ĉar vi neniam forgesas la ofendojn al vi faritajn. Sciu, tamen, ke la homoj noblaj kaj grandanimaj ne atentis pri tiaj bagateloj. Ĉu vi eltiris vin kun piedo lama el la bernado? Ĉu oni frakasis al vi ian riplon, aŭ fendis la kapon, ke vi ne povas forgesi tiun ŝercon? Ĉar, finfine, temas nur pri ŝerco kaj distro, kaj sciu, ke, se mi opinius alie pri via bernado, mi jam estus reveninta al la gastejo kaj farinta, por venĝi vin, pli da damaĝo ol la grekoj faris pro la forkapto de Helena, kies beleco, se ŝi vivus en nia tempo, aŭ Dulcinea en la ŝia, ne estus tiel fama.

Kaj don Quijote elĵetis tian fortan suspiron, ke ĝi flugis ĝis la nuboj.

—Nu, bone, temu pri ŝerco —diris Sancho—, des pli, ke jam ne eblas serioze venĝi al ĝi. Sed mi bone konas la konsiston de tiaj ŝercoj kaj malŝercoj, kaj tion, ke ili ne viŝiĝos de nia memoro, kaj ankaŭ ne de mia dorso. Sed ni lasu ĉi aferon kaj diru, sinjoro, kion mi faros kun ĉi griz-makula ĉevalo, simila al bruna azeno, kiun forlasis la pagano de vi renversita. Laŭ lia maniero peli la piedojn, evidentas, ke li neniam revenos serĉi ĝin. Kaj, je Dio, la azeno estas vere bona.

—Mi ne kutimas preni ion de la venkitoj —diris don Quijote—. Krome, laŭ la reguloj de la kavalirismo oni ne devas kapti la ĉevalon de kavaliro kaj lasi lin iri piede, escepte se la

venkinto perdis la sian en la batalo; ĉi-okaze licas preni la ĉevalon de kontraŭulo kiel militan predon. Do, Sancho, lasu iri ĉi ĉevalon, aŭ azenon, aŭ kion ajn vi deziras, ke ĝi estu, ĉar tuj kiam ĝia mastro vidus nin foriri, li revenos ĝin serĉi.

—Dio scias, ke mi volonte prenis ĝin, aŭ almenaŭ ĝin ŝanĝus por mia azeno, kiu ŝajnas ne tiel bona bruto. Vere tre striktas la kavaliraj leĝoj, se ili ne permesas la ŝanĝon de unu azeno por alia. Mi volus scii, ĉu mi povus ŝanĝi almenaŭ la harnison.^[95]

—Pri tio mi ne certas —respondis don Quijote—, sed, ĝis mi informiĝos pli bone, ĉar temas pri duba kazo, faru la ŝanĝon, se tio absolute necesas.

—Tiel absolute —diris Sancho—, ke, se la harniso estus por mia propra persono, ne tiel multe mi bezonus ĝin.

Kun la konsento de don Quijote la ŝildisto faris la *mutatio caparum*^[96] kaj metis al la azeno tiom da garnaĵoj, ke ĝi aspektis plej linde, dank' al la avantaĝa ŝanĝo.

Poste ili manĝis la restaĵojn de la viktualio prenita disde la ŝarĝo-mulo de la eskortintoj de la kadavro kaj trinkis el la roĵo, kies akvo movadis la ful-martelojn. Sed nek don Quijote nek la ŝildisto turnis la rigardon al ties direkto: tiel forte ili abomenis la martelojn, kies bategado metis al ili la timon en la koron, ili manĝis, ilia malsato, kaj eĉ ilia melankolio, ĉesis, kaj, surseliĝinte, sen preni difinitan vojon (ĉar la vagantaj kavaliroj kutimis lasi tion al la hazardo) ili ekiris laŭ la volo de Rocinante, al kies decidoj submetiĝis ĝia mastro kaj same la azeno, kiu en paco kaj kontento, kiel bona kompano, ĉiam sekvis la ĉevalon, kien ajn ĝi sin turnis. Tiel do, ili revenis al la ĉef-vojo kaj iris sur ĝi sencele, sen ia difinita projekto. Tiam la ŝildisto diris:

—Sinjoro, ĉu vi bonvolus doni al mi la permeson paroli iom kun vi? De kiam vi trudis al mi la rigoran ordonon silenti, kvar aŭ kvin aferoj putris en mia stomako. Nun mi havas alian ĉe la pinto de la lango kaj ne volus, ke ankaŭ ĝi difektiĝu.

—Parolu, sed lakone —diris don Quijote—. La rezonoj, se longaj, ne plaĉas.

—Mi diras, sinjoro, ke de kelkaj tagoj mi pensas, kiel ete oni lukras kaj ricevas, vagante, kiel via moŝto, por serĉi aventurojn sur ĉi dezertoj kaj foraj vojoj, kie, eĉ se oni entreprenus kaj sukcese plenumus la plej danĝeraj farojn, neniu vidus nek konus ilin. Ili do restus eterne en la forgeso, damaĝante vian intencon kaj sian propran meriton. Ŝajnas al mi pli konvene (escepte se la supera juĝo de via moŝto ne decidus alion), ke ni iru servi imperiestron aŭ grandan princon militantan. Je lia servo vi moŝto montrus la kuraĝon de via persono, vian grandan forton kaj pli grandan saĝon. Vidante tion, la sinjoro, kiun ni servus, nepre rekompencus nin laŭ niaj respektivaj meritoj, kaj eĉ ne mankus aŭtoro preta skribi la farojn de via moŝto kaj ilin eternigi. Pri la faroj miaj, nenion mi diras, ĉar ili devas teni sin inter la ŝildistaj limoj. Tamen mi povas diri, ke, se oni kutimas en kavalirismo registri ankaŭ la farojn de la ŝildistoj, mi kredas, ke la miaj ne pasus nemenciitaj.

—Vi diris ion saĝan —respondis don Quijote—, sed, antaŭ ol atingi tian stadion, la kavaliro bezonas, kvazaŭ en sinprovado, vagadi tra la mondo, serĉi aventurojn, plenumi kelkajn kaj akiri tian famon kaj reputacion, ke, kiam li iras al la kortego de monarko, li estas jam konata pro siaj faroj, kaj la strataj buboj, apenaŭ vidinte lin paŝi tra la pordego de la urbo, sekvas kaj ĉirkaŭas lin kaj krias: «Jen la Kavaliro de la Suno!», aŭ de la Serpento, aŭ de ajna emblemo sub kies signo li plenumis siajn heroaĵojn. «Jen», ili diras, «la kavaliro

venkinta en persona duelo la monstran kaj fortegan giganton Brocabruno, kaj liberiginta el longa ensorĉo de preskaŭ naŭcent jaroj la grandan mamelukon de Persujo». Tiel, de buŝo al buŝo, oni proklamas liajn farojn, kaj, aŭdante la kriadon de la buboj kaj de la ceteraj homoj, la reĝo rigardas tra la fenestro de sia palaco, vidas kaj nepre diras: «Hej, ĉiuj kavaliroj de la kortego eliru ricevi la floron de la kavalirismo! Li jam alvenas!». Ĉe la komando de la reĝo ili eliras, kaj la reĝo mem descendas la duonon de la ŝtuparo, fortege brakumas la kavaliron, donas al li kison sur la vangon, kiel signon de paco, kaj poste lin gvidas je la mano al la salono de ŝia moŝto la reĝino. Tie la kavaliro renkontiĝas kun ŝia filino, la princino, kiu devas esti unu el la plej perfektaj kaj belaj puceloj apenaŭ troveblaj en la pli granda parto de la konata mondo. Tuj poste okazas, ke ŝi turnas al li la rigardon, li reciprokas al ŝi, ĉiu ŝajnas al la alia pli dia ol homa, kaj sen konscii kiel aŭ kial, ili ambaŭ kaptiĝas kaj implikiĝas en la densa reto de la amo kaj sentas profundan aflikton en la koro, ĉar ili ne scias, per kiaj vortoj montri siajn sopirojn kaj dezirojn. De tie sendube oni kondukas lin al lukse ornamita ĉambro de la palaco, kaj, demetinte de li la armaĵon, oni proponas al li riĉan mantelon skarlatan, por ke li sin kovru per ĝi. Kaj, se li belas en armaĵo, li belas eĉ pli en tuniko. Jam en la nokto li manĝas kun la gereĝoj kaj kun la princino, kaj senĉese, kvankam ŝtele, li tenas la rigardon fiksa sur ŝi. Ŝi faras la samon kun sagaco simila al la lia, ĉar, kiel mi jam diris, ŝi estas tre diskreta pucelo. Oni finas manĝi kaj tra la pordo de la salono subite eniras turpa kaj eta nano, kaj, post li, bela damo inter du gigantoj. Ŝi anoncas la komencon de provo elpensita de tre antikva sorĉisto kaj aldonas, ke, kiu sukcese plenumos la provon, tiun oni proklamos la plej bona kavaliro de la mondo. Poste la reĝo ordonas, ke ĉiuj kavaliroj partoprenu, sed neniu sukcesas la provon, krom la kavaliro-gasto, kies gloro pli kreskas per tio. Tiam la princino tre ĝojas, fieras kaj feliĉas, ĉar ŝi metis kaj lokis sian sopiradon sur tielan alton.

Kaj la bono de la afero estas, ke ĉi reĝo, aŭ princo, aŭ monarko, militadas kontraŭ alia tiel potenca kiel li, kaj la kavaliro-gasto, pasiginte kelke da tagoj en la kortego, petas de la reĝo la permeson servi lin en la milito. La reĝo konsentas kun volonto, la kavaliro kisas al li la manon pro la favoro kaj tiun saman nokton adiaŭas sian damon, la princinon, tra la krado de ĝardeno apuda al ŝia dormoĉambro. Li jam antaŭe parolis kun ŝi multe da fojoj tra la dirita krado dank' al la perado de unu honor-damo, kiun la princino plene konfidas. Li suspiras, ŝi svenas, la damo alportas akvon kaj tre angoras, ĉar la mateniĝo proksimas, kaj ŝi ne volus, ke oni surprizus la paron kaj sekve kompromitiĝus la honoro de ŝia sinjorino. Fine la princino rekonsciiĝas de sia sveno, donas tra la krado siajn blankajn manojn al la kavaliro, li kisas ilin mil fojojn kaj kovras ilin per larmoj; la paro akordiĝas pri la maniero sciigi unu la alian la novaĵojn, bonajn aŭ mavajn, kaj la princino petegas la kavaliro foresti kiel eble plej mallonge, kion li promesas kun multe da ĵuroj; denove li kisas al ŝi la manojn kaj adiaŭas ŝin kun tia aflikto, ke li preskaŭ mortas. De tie li iras al sia ĉambro, ĵetas sin sur la liton, ne povas dormi pro la doloro de la disiĝo, frue leviĝas kaj iras diri adiaŭ al la gereĝoj kaj al la princino. Adiaŭante lin, la gereĝoj diras, ke ŝia moŝto la princino ne bone fartas kaj ne povas ricevi vizitojn. Li konkludas, ke ŝi suferegas pro lia foriro, kaj lia koro tiel afliktiĝas ĉe tio, ke li preskaŭ ne povas ne perfidi sian sekreton. La honor-damo de la princino devas ĉion rimarki, iras informi sian sinjorinon, kiu akceptas ŝin kun larmoj kaj diras, ke unu el ŝiaj grandaj doloroj estas, ke ŝi scias nek la nomon de la kavaliro, nek tion, ĉu li devenas, aŭ ne, de reĝa familio. La damo respondas, ke tiom da ĝentilo, gracio kaj kuraĝo, kiom la kavaliro montras, povas sidi nur en persono reĝa kaj eminenta. Tio konsolas la afliktitan princinon, ŝi klopodas sereniĝi por ne tiri al si la suspekton de siaj gepatroj kaj montriĝas publike post du tagoj. La kavaliro jam foris, militas, venkas la malamikon de la reĝo,

konkeras grandan nombron da urboj, triumfas en multaj bataloj, revenas al la kortego, renkontiĝas kun la princino en la kutima loko kaj akordas kun ŝi, ke li petos de la reĝo ŝian manon kiel rekompenco pro siaj servoj. La reĝo ne konsentas, ĉar li ne scias, kiu estas la kavaliro. Tamen, aŭ forkaptinte ŝin, aŭ uzinte iun ajn alian rimedon, li edziĝas al la princino kaj fine ŝia patro rigardas tion grandioza, ĉar riveliĝis dume, ke la kavaliro estas filo de kuraĝa monarko, kies regnon mi ne konas, ĉar mi opinias, ke ĝi ne troviĝas en la mapoj. La patro de la princino mortas, ŝi heredas la tronon, resume, ankaŭ la kavaliro fariĝas reĝo. Tiam venas la momento rekompenci la ŝildiston kaj la ceterajn homojn, kiuj helpis la kavaliro atingi tiel altan rangon; li edzigas la ŝildiston al honor-damo de la princino, sendube al la sama, kiu peris en lia idilio kaj kiu estas filino de tre eminenta duko.

—Ke tio efektiviĝu, mi deziras —diris Sancho—. Kaj tion mi atendas, ĉar, sub la nomo «la Kavaliro de la Trista Mieno», via moŝto igos, ke ĉio okazu tiel, kiel vi ĵus diris.

—Sendube, Sancho —respondis don Quijote—. Kiel dirite, la vagantaj kavaliroj leviĝas kaj leviĝis, laŭ la sama maniero kaj per la sama paŝoj, ĝis la trono de reĝoj kaj imperiestroj. Ni bezonas nur vidi, ĉu nuntempe militas ajna kristana aŭ pagana reĝo havanta belan filinon. Sed ni havos tempon por tio, ĉar, kiel mi jam diris, ni devas unue akiri famon aliloke, antaŭ ol iri al la kortego. Krome, ekzistas la problemo, ke, eĉ se mi akirus senmortan famon tra la tuta universo kaj trovus reĝon kun milito kaj kun bela filino, mi ne scias, kiel pruviĝus, ke mi estas de reĝa familio, aŭ, almenaŭ, kuzo, je la dua grado, de imperiestro. Ĝis li certiĝus pri ĉi punkto, la reĝo ne konsentus doni al mi edzinige sian filinon, kiom ajn grandaj estus la meritoj de miaj famaj faroj. Tiel do, mi timas, ke tial mi perdos kion mia kuraĝo meritas. Tamen mi estas hidalgo el konata familio, laŭleĝa bienmastro kaj kun

la privilegio ricevi kvin-cent soldojn,^[97] do povos okazi, ke la saĝulo skribonta mian historion, tiel profunde esploros kaj aranĝos mian genealogion, ke li trovos, ke mi estas nepo, je la kvina aŭ sesa grado, de ia reĝo. Ĉar vi devas scii, Sancho, ke ekzistas du specoj de genealogioj en la mondo: unu havas sian originon en reĝoj kaj monarkoj kaj laŭgrade reduktiĝas ĝis unu punkto, kvazaŭ piramido en renversita pozicio; la alia komenciĝas per ordinaraj homoj, kiuj supiras ŝtupon post ŝtupo ĝis la rango de la grandaj sinjoroj. Tiel do, la diferenco kuŝas en tio, ke unuj estis kaj ne plu estas, dum aliaj estas, sed ne estis. Eble mi povos pruvi, ke mi apartenas al familio de granda kaj nobla origino, kaj je tio devos kontentiĝi mia bopatro, la reĝo, kiu ajn li estos. Cetere la princino amos min tiel, ke, kvankam ŝia patro kredos min filo de kolportisto, ŝi akceptos min kiel sian sinjoron kaj edzon. Se, tamen, ŝi ne volos, tiam konvenos ŝin rabi kaj porti ŝin, kien ajn mi deziros, ĉar la tempo, aŭ la morto, metos finon al la kolero de ŝiaj gepatroj.

—Sendube al tia okazo konformas la diro de kelkaj friponoj: «Ne petu kion vi povas perforte preni», kaj eĉ pli bone la jena: «Prefere eskapi trans la muron, ol resti pro peto de bonulo». Mi tion diras, ĉar, se la sinjoro reĝo, bopatro de via moŝto ne degnos cedi al vi la sinjorinon princinon, tiam, kiel via moŝto diris, nenion alian oni povos fari, krom forkapti kaj kaŝi ŝin. La tubero en la afero estas, ke antaŭ ol denove fariĝos la paco kaj vi trankvile ĝuos la bonojn de la reĝado, al la kompatinda ŝildisto mankos la promesitaj favoroj, kvankam espereble la perinta honordamo, kiu fariĝos lia edzino, akompanos la princinon, kaj li dividos kun ŝi sian misfortunon ĝis la ĉielo volos. Ĉar mi pensas, ke via moŝto povos doni la honordamon al la ŝildisto kiel laŭleĝan edzinon.

—Vere kaj sendube —diris don Quijote.

—Se tiel —respondis Sancho— nenio pli fareblas, krom rekomendi nin al Dio kaj lasi la sorton disponi.

—Dio donu kion mi deziras kaj kion vi, Sancho, bezonas —diris don Quijote—. Kaj humila estu, kiu sin konsideras tia.

—Amen —respondis Sancho—. Rilate min, mi kredas, ke mia old-kristaneco sufiĉas, por ke oni faru min grafo.

—Kaj eĉ pli ol sufiĉas —diris don Quijote—. Kaj, kvankam vi ne estus tio, la afero ne gravus, ĉar, estante reĝo, mi facile povos doni al vi nobel-ateston, sen ia bezono de via flanko aĉeti ĝin, aŭ pagi ĝin per servo. Kaj se mi faros vin grafo, nu, bone, vi fariĝos per tio kavaliro, kion ajn oni opinios. La homoj devos trakti vin kiel tian kavaliron, ĉu vole, ĉu nevole.

—Kaj via moŝto ne dubu, ke mi scios kondukti laŭ tiel alta ranko.

—«Rangon» vi diru, ne «rankon» —korektis don Quijote.

—Kiel vi volas —respondis Sancho—. Mi diras, ke mi tre scios akomodiĝi al la stato de grafo. Iam mi funkciis kiel pedelo de pia societo kaj la pedela robo tiel bele sidis sur mi, ke oni opiniis, ke mi havas sufiĉe imponan aspekton por esti la sindiko mem. Nun, ĉu mi ne aspektos vere grandioze, kiam mi surmetos dukan mantelon, aŭ vestos min per oro kaj perloj, laŭ la modo de fremdlandaj grafoj? Sendube oni venos admiri min de cent mejloj.

—Vi bele aspektos —diris don Quijote—, sed necesos, ke vi aranĝu al vi la barbon pli ofte. Vi portas ĝin tiel densa, sovaĝa kaj hirta, ke se vi ne uzos la razilon almenaŭ ĉiun duan tagon, eĉ defore vidiĝos, kia vi estas.

—Nu, bone, mi dungos barbiron kaj tenos lin ĉe mi. Kaj, se necese, mi disponos, ke li sekvu min kiel eskviro grandulon.

—Kial vi scias, ke la eskviroj iras post siaj granduloj?

—Nu, antaŭ kelkaj jaroj —respondis Sancho— mi pasigis monaton en la kortega urbo kaj vidis promeni etan kavaliron. Oni diris pri li, ke li estas granda grandulo,^[98] kaj unu rajdanto sekvis lin tiel ĝuste kaj precize, kiel la vosto sekvas la bruton. Mi demandis, kial la du viroj iras, ne unu ĉe la flanko de la alia, sed ĉiam la rajdanto post la grandulo, kaj oni klarigis al mi, ke la sekvanto estas eskviro, kaj kaj ke la granduloj kutimas teni ilin post si. Mi lernis tiel bone tiun aferon, ke neniam mi ĝin forgesis.

—Vi pravas —diris don Quijote—, kaj vi povos ordoni vian barbiron sekvi vin en la sama maniero. La kutimoj ne aperis ĉiuj samtempe, nek oni kreis ilin per unu fojo, do vi povos esti la unua grafo kun barbiro malantaŭe, des pli, ke aranĝanto de barbo ŝajnas pli inda je konfido ol selanto de ĉevalo.

—Tion pri la barbiro lasu al mi —respondis Sancho—. Via moŝto zorgu nur sidiĝi sur trono de reĝo kaj fari min grafo.

—Tiel estos —promesis don Quijote.

Kaj, rigardante supren, li vidis kion oni priskribas en la sekvanta ĉapitro.

^[93] Ĉar Mambrino estis, en la kavaliraj romanoj, maŭra reĝo.

^[94] Oni kredis, ke, kiam la kastoro vidas, ke ĝi ne plu povas eskapi de la ĉasistoj, ĝi kastras sin kaj lasas sur la grundo la parton de sia korpo deziratan de la persekutantoj, por ke ili ne daŭrigu la ĉasadon.

[95] Neologismo. Hispane «arnés»; france «harnais»; angle «harness». Tuto el la bridoj, kondukiloj, ventrobendo, ktp, kiujn ordinare portas la rajd- kaj ŝarĝo-bestoj.

[96] Latine: «ŝanĝo de manteloj». Ceremonio, kiun plenumis la kardinaloj kaj prelatoj de la papa kurio en la Tago de la Releviĝo. Ĝi konsistis en tio, ke ili anstataŭigis al si siajn felajn mantelojn por aliaj el ruĝa silko.

[97] Kiam oni ofendis hidalgon, li rajtis ricevi de la ofendinto kvincent soldojn. La ne-hidalgoj rajtis ricevi ne pli ol tricent.

[98] Ŝajnas aludo al don Pedro Girón, dukoj de Osuna, vic-reĝo de Sicilio kaj Napolo. Li havis tre malaltan staturon.

Ĉapitro 22

Pri kiel don Quijote liberigis multe da kompatinduloj kondukataj al loko, kien ili tute ne volis iri

Rakontas la arabo kaj manĉano Cide Hamete Benengeli, aŭtoro de ĉi elokventa, grava, fikcia, detala kaj ĝentila historio, ke, post ol la fama don Quijote de La Mancha kaj lia ŝildisto Sancho Panza babilis kion oni legas en la lasta parto de la 21-a ĉapitro, nia hidalgo levis la rigardon kaj vidis, ke sur la vojo piede proksimiĝas ĉirkaŭ dek du viroj interkroĉitaj je la kolo per longa ĉeno fera kaj kun la manoj en katenoj. Ilin gardis du rajdantoj kun musketoj kaj du piedirantaj viroj kun sagoj kaj glavoj. Sancho, ekvidante ilin, diris:

—Jen ĉeno de punatoj, kiujn la reĝo sendas per la forto al la galeroj.

—Kion? —demandis don Quijote—. Ĉu estas eble, ke la reĝo uzas sian forton ĉi-maniere kontraŭ personoj?

—Mi ne diras tion —respondis Sancho—. La afero estas, ke pro iliaj krimoj oni ilin kondamnis punlabori en la galeroj de la reĝo, kaj ili iras tien perforte.

—Resume —diris don Quijote—. Iel aŭ tiel, ĉi homoj iras, ne propravole, sed devigite.

—Efektive —diris Sancho.

—Se tiel do —respondis lia mastro—, jen okazo por mi, ĉar, laŭ mia profesio, mi devas kontraŭbatali la forton kaj helpi kaj konsoli la feblajn.

—Konsideru via moŝto —diris Sancho—, ke la justico, nome la reĝo mem, uzas nenian forton nek arbitron kontraŭ tiaj homoj, kaj nur punas ilin pro ties krimoj.

Ĉe tio alvenis la ĉeno de la galeruloj kaj don Quijote petis plej ĝentile la gardistojn, ke ili bonvolu informi lin pri la motivo aŭ motivoj konduki tiamaniere la ĉenulojn. Unu el la rajdantaj gardistoj respondis, ke temas pri punatoj de lia moŝto la reĝo irantaj al la galeroj, kaj ke ne necesas pliaj klarigoj nek pliaj demandoj.

—Tamen —respondis don Quijote— al mi plaĉus scii la kaŭzon de la misfortuno de ĉiu el ili.

Kaj al tio li aldonis tiel ĝentilajn vortojn por persvadi lin, ke la alia rajdanto fine diris:

—Kvankam ni portas registritan kopion de la verdiktoj de ĉi mizeruloj, ne estas nun tempo legi ilin. Via moŝto mem demandu al la punatoj kaj ili respondos al vi, se ili volos. Kaj certe ili volos, ĉar temas pri homoj, kies plezuro estas fari friponaĵojn kaj poste fanfaroni pri ili.

Kun ĉi permeso, kiun don Quijote prenis al si, se li ne estus ĝin ricevinta, li iris ĝis la ĉeno kaj demandis al la unua viro, pro kiaj pekoj li troviĝas en tiel mizera stato. La kondamnito respondis, ke pro tio, ke li amis.

—Nur pro tio? —diris don Quijote—. Se oni punas la amantojn je galeroj, jam de longe mi remus en ili.

—Ne temas pri la speco de amo, kiun via moŝto imagas —diris la galerulo—. Mi enamiĝis pasie, sed al korbo plena de tolo, kaj ĝin brakumis tiel, ke se la justico ne dekroĉus ĝin de miaj manoj, mi estus ankoraŭ gluita al ĝi. Oni kaptis min ĉe la freŝa faro, do oni ne torturis min; laŭ la verdikto de la

tribunalo, oni regalas al mi la dorson per cent rimenfrapoj kaj kondamnis min al tri jaroj en la *gurapas*.

—Kio estas «gurapas»? —demandis don Quijote.

—Galeroj —klarigis la deliktulo, juna viro ĉirkaŭ dudekkvinjara, naskiĝinta en Piedrahíta.

Don Quijote demandis poste al la dua viro, sed lin premis tia tristo kaj melankolio, ke li ne respondis eĉ unu vorton. Sed la unua alparolito respondis por li, dirante:

—Ĉi ulo troviĝas ĉi tie, ĉar li estas kanario; pli ĝuste, ĉar li kantas kaj muzikas.

—Nur pro tio? —ripetis don Quijote—. Ĉu ankaŭ kantantoj kaj muzikantoj iras al la galeroj?

—Jes, sinjoro —respondis la galerulo—, ĉar ekzistas nenio pli terura ol kanti en la angoro.

—Mi ĉiam aŭdis —diris don Quijote—, ke, kiu kantas ĉiuhore, tenas siajn zorgojn fore.

—Ĉi tie okazas la malo. Kiu kantas nur unu fojon, ploras la tutan vivon.

—Mi ne komprenas —konfesis don Quijote.

Sed unu el la gardistoj intervenis:

—Sinjoro kavaliro, kanti en la angoro, signifas inter la friponaro konfesi per torturo. Al ĉi pekulo oni aplikis torturon kaj li konfesis sian krimon; ŝteli brutojn. Kaj, ĉar li konfesis, oni kondamnis lin al ses jaroj en galeroj kaj krome al ducent rimenfrapoj, kiujn li jam ricevis sur la dorson. Kaj li ĉiam vidiĝas deprimita kaj trista, ĉar la ceteraj ŝtelistoj tie kaj ĉi

tie mistraktas, insultas, mokas kaj disdegnas lin, tial, ke li konfesis kaj ne kuraĝis diri ne. Ili asertas ke «jes» aŭ «ne» prononciĝas same facile, kaj ke deliktulo estas bonsorta, kiam lia vivo dependas, ne de atestantoj kaj pruvoj, sed de lia propra lango. Kaj mi opinias, ke ili ne malpravas.

—Mi same pensas —diris don Quijote, kaj sin turninte al la tria ĉenulo, demandis la samon, kiel al la aliaj. La kondamnito tuj kaj senĝene respondis:

—Mi pasos kvin jarojn en la plej moŝtindaj moŝtoj, la *gurapas*, ĉar mankis al mi dek dukatoj.

—Mi volonte donus dudek por eltiri vin el ĉi tia sorto.

—Tio —respondis la galerulo— igas min pensi pri homo, kiu kun mono meze de la oceano mortas je malsato, ĉar li ne trovas lokon, kie li povus aĉeti kion li bezonas. Mi diras tion, ĉar, se mi havus siatempe la monon nun proponitan de via moŝto, mi estus ŝmirinta per ĝi la plumon de la aktisto kaj vigliginta la ruzon de la prokuroro, tiel, ke hodiaŭ mi troviĝus en la placo Zocodover de Toledo, ne sur ĉi vojo kaj ligita kiel levrelo. Sed Dio estas granda; kaj nur paciencon oni bezonas.

Don Quijote iris poste al la kvara kondamnito, viro de ege respektinda aspekto kaj kun blanka barbo longa ĝis preskaŭ la talio. Demandite, kial li troviĝas tie, li komencis plori kaj ne respondis eĉ unu vorton; sed la kvina kondamnito parolis pri li, dirante:

—Ĉi honesta viro pasos pasos nur kvar jarojn en la galeroj, post ol li jam promenis parade kaj surĉevale^[99] sur kelkaj stratoj de la urbo.

—Ŝajnas al mi, ke vi volas diri, ke oni montris publike lian infamion.

—Efektive —respondis la galerulo—, kaj oni kondamnis lin, ĉar li funkciis kiel makleristo de orelo^[100] kaj eĉ de la tuta korpo. Mi volas diri, ke ĉi sinjoro troviĝas ĉi tie, tial, ke li estas pandaro^[101] kaj, en eta parto, ankaŭ sorĉisto.

—Se ne ekzistus tio pri la eta parto —diris don Quijote— rilate al la pandarado li meritis, anstataŭ remi en la galeroj, komandi ilin kiel admiralo. Pandari estas ne io ajn, sed laboro de diskretaj personoj ege necesa en bone organizita ŝtato. Nur homoj de honesta konduto devus dediĉi sin pandari, kaj, kiel en la ceteraj profesioj, en la pandarado oni devus elekti la kandidatojn per kontroloj kaj ekzamenoj kaj atribui al ĉiu elektito numeron registritan kaj publikan, same kiel oni faras kun la makleristoj de la borso. Tiel oni evitus grandan nombron da fuŝoj, nun okazantaj pro tio, ke ĉi ofico troviĝas en la manoj de homoj idiotaj kaj duonkretenaj, kiaj estas pedikaj virinaĉoj, paĝioj kaj junaj friponoj senspertaj. Tial, kiam al ili prezentiĝas delikata okazo kaj necesas do saĝa decido, la kaĉo fridiĝas al ili inter la telero kaj la buŝo, kaj ili eĉ ne scias distingi sian dekstran manon de la liva. Mi volonte klarigus, kial konvenus elekti per konkurso la funkciulojn de tiel grava profesio, sed nun ne estas la ĝusta momento por paroli pri tia temo; iam mi traktos ĝin kun personoj povantaj apliki al la afero efikan rimedon. Nun mi diras nur, ke la doloro vidi en ĉi tia mizero, pro pandarado, ĉi blankajn harojn kaj ĉi ege respektindan vizaĝon, ĉesis en mi, kiam mi aŭdis la vorton «sorĉisto». Mi bone scias, ke en la mondo ekzistas nenia sorĉaĵo kapabla rompi aŭ perforti la volon, kvankam kelkaj naivuloj kredas la malon. La volo, ja, estas libera, kaj nek herboj nek sorĉaĵoj povas trudiĝi al ĝi. Okazas nur, ke kelkaj simplanimaj virinaĉoj kaj friponaj trompisto faras pociojn kaj venenojn kaj asertas, frenezigante per ili la homojn, ke ili havas la povon devigi ami, kvankam, kiel mi jam diris, neblas perforti la volon.

—Vi pravas —respondis la honesta oldulo— kaj, se diri la veron, sinjoro, mi ne kulpas je sorĉaĵoj, kvankam mi ne povas nei, ke mi pandaris. Tamen, mi pensis, ke mi faras nenian mavon per tio; mi intencis nur, ke la tuta mondo vivu pace, trankvile kaj plezure, sen kvereloj kaj ĉagrenoj. Sed ĉi bona deziro mia ne evitis al mi iri nun al loko, de kie mi ne esperas reveni, konsiderante, ke mi havas altan aĝon kaj krome urinan afekcion, kiu ne lasas al mi eĉ unu momenton da ripozo.

La oldulo komencis plori kiel antaŭe, kaj Sancho tiel kortuŝiĝis, ke li elprenis de sub sia ĉemizo kvar-realan moneron kaj donis ĝin al li kiel almozon.

Don Quijote antaŭenpaŝis, demandis al la sekvanta ĉenulo pri ties delikto, kaj la punato respondis multe pri senhonte ol la aliaj, dirante:

—Mi estas ĉi tie, ĉar mi tro petolis kun du kuzinoj miaj, kaj kun du fratinoj ne miaj. Fine mi tion petolis kun la kvar, ke el la petolado rezultis, ke mia familio kreskis kaj implikiĝis tiamaniere, ke eĉ la diablo mem ne povus klarigi al si la interparencecon de ĝiaj membroj. Oni konviktis min, mi ne havis monon, al mi mankis protekto, mi preskaŭ perdis la glutilon,^[102] ricevis kondamnon de ses jaroj en la galeroj, kaj ne apelaciis, ĉar mi kulpas; sed mi estas juna, kaj la vivo longas kaj ĉion aranĝas. Se via moŝto, sinjoro kavaliro, havas ion por doni al ni, povraj mizeruloj, Dio vin rekompencos en la ĉielo, kaj ni en la tero zorgos peti Lin en niaj preĝoj, ke Li donu al vi sanan kaj longan vivon, kian via moŝto meritas.

La parolinto portis studentan robon, kaj unu el la gardistoj diris pri li, ke li estas klera latinisto kaj tre babilema. Poste venis la vico de viro proksimume tridek-jara, de tre agraba aspekto, kvankam li iomete strabis. Li estis ligita alie ol la ceteraj punatoj: longa ĉeno envolvis lian korpon kaj treniĝis

ĉe liaj piedoj, kaj du feraj ringoj ĉirkaŭis lian kolon: unu estis fiksita al la ĉeno, kaj de la alia, nomata «amiko-garda» aŭ «amiko-pieda» descendis du feraĵoj ĝis la talio, provizitaj per mankateno, kiu, kun dika kaj ŝlosita pendoseruro, sekure retenis al li la pojnojn, tiel, ke li povis nek levi la manojn al la buŝo, nek klini la kapon al la manoj.

Don Quijote demandis, kial tiu homo portas pli da feroj ol la aliaj, kaj la gardisto respondis, ke li kulpas pli da krimoj ol la ceteraj punatoj kune, kaj ke li estas tiel aŭdaca kaj ruza fripono, ke, eĉ vidante lin en tia stato, oni ne povas esti certa, ke li ne eskapos.

—Kiajn krimojn li faris? —demandis don Quijote—. Ŝajne li meritas ne pli grandan punon ol remi en la galeroj.

—Li servos en ili dek jarojn, kio egalas al speco de civila morto —respondis la gardisto—. Sufiĉas scii, ke ĉi homo estas la fama Ginés de Pasamonte, nomata ankaŭ Ginesillo de Parapilla.

—Ne impertinentu, sinjoro komisaro, nek komencu fari nun distingojn inter nomoj kaj alnomoj. Mi nomiĝas Ginés, ne Ginesillo, kaj Pasamonte estas mia familia nomo, ne Parapilla, kiel vi diras. Prefere oni okupu sin pri siaj propraj aferoj, kaj punkto.

—Ne parolu kun tiel fieraĉa tono, sinjoro protoŝtelisto, aŭ mi trudos al vi silenton.

—Klare vidiĝas, ke oni devas submetiĝi al la cirkonstancoj kaj al la volo de Dio —respondis la galerulo—. Sed iam oni scios, ĉu mi nomiĝas, aŭ ne, Ginesillo de Parapilla.

—Ĉu oni ne nomas vin tio, fripono? —diris la gardisto.

—Jes —respondis Ginés—, sed mi igos, ke oni ĉesu doni al mi tian nomon vole, nevole. Sinjoro kavaliro, se vi havas ion por doni al ni, jam donu ĝin, kaj Dio vin akompanu, ĉar ĝenas tiel granda scivolo koni la vivon de aliaj homoj; kaj se vi deziras koni la mian, sciu, ke mi estas Ginés de Pasamonte, kies vivon mi skribis per ĉi fingroj.

—Li ne mensogas —diris la komisaro—. Li mem skribis tre bonan historion pri sia vivo, sed en la prizono lombardis la manuskripton por ducent realoj.

—Kaj mi liberigos ĝin de la lombardo, eĉ se tio kostus al mi ducent dukatojn —diris Ginés.

—Tiel bona estas la historio? —demandis don Quijote.

—Tiel bona —respondis Ginés—, ke nek *Lazarillo de Tormes*, nek la ceteraj libroj de la sama ĝenro skribitaj kaj skribotaj povos elteni la konkuron kun la mia. Mi diru nur, ke ĝi temas pri veroj tiel belaj kaj amuzaj, ke nenia mensogo kompareblas kun ili.

—Kiun titolon havas via libro? —demandis don Quijote.

—*Vivo de Ginés de Pasamonte*.

—Ĉu vi skribis ĝin ĝis la fino?

—Kiel mi povus fari tion, se mia vivo ne finiĝis ankoraŭ? La rakonto ampleksas de mia naskiĝo ĝis nun, kiam mi denove servos en la galeroj.

—Ĉu vi jam antaŭe estis do en ili? —demandis don Quijote.

—En ili mi sidis kvar jarojn por servi al Dio kaj al la reĝo kaj konas la guston de la seka pano kaj de la skurĝo —respondis Ginés—. Sed mi ne bedaŭras residi en ili, ĉar mi povos tie

fini mian libron, aldonante ankoraŭ multe da dirindaĵoj. En la galeroj de Hispanujo oni ĝuas pli da trankvilo ol necese,^[103] kvankam mi ne bezonas multe da ĝi, tial, ke mi scias parkertion, kio mankas ankoraŭ en la libro.

—Vi ŝajnas lerta —diris don Quijote.

—Kaj senfortuna —respondis Ginés—. Ĉiam la malfeliĉo persekutas la talenton.

—Persekutas la friponojn —diris la komisaro.

—Mi jam petis vin ne impertinenti, sinjoro komisaro —diris Pasamonte—. Viaj superuloj transdonis al vi la ordonbastonon, ne por ke vi mistraktu nin, homojn kompatindajn, sed por ke vi gvidu nin al la loko, kien lia moŝto la reĝo volas, ke ni iru. Alie mi ĵuras, ke... sed sufiĉas. Mi ne plu parolos, por ne diskonigi tion okazintan en la gastejo...^[104] Ni ĉiuj tenu la langon en la buŝo, konduku prudente kaj parolu ĝentile. Kaj nun, ni plu iru, ĉar ĉio ĉi jam ŝajnas tro teda afero.

La komisaro levis la bastonon por respondi per ĝi la insolenton de Pasamonte, sed don Quijote sin intermetis, petis lin ne mistrakti la ĉenulon kaj diris, ke ne gravas, se homo kun la manoj en kateno lasas la langon iom libera. Poste li sin turnis al la ceteraj ĉenuloj kaj diris:

—El ĉio, kion vi diris, karegaj fratoj, mi klare vidas, ke, kvankam oni kondamnis vin pro viaj kulpoj, la punoj de vi suferotaj ne multe plezurigas vin. Vi iras al la galeroj tre malvolonte kaj kontraŭvole, kaj, krome, eble nur la manko de kuraĝo sub la torturo ĉe unu, la senmoneco ĉe la dua, la foresto de influoj ĉe la alia kaj fine la arbitroj de la juĝistoj kaŭzis vian perdiĝon kaj tion, ke oni ne traktis vin kun la justeco al vi ŝuldata. Ĉio ĉi forte prezentiĝas nun al mi en la

kapo kaj persvadas, eĉ devigas min, montri, favore al vi, ke la ĉielo sendis min al ĉi mondo, por ke mi servu en la ordeno kavalira donante helpon al la feblaj kaj al la ĝemantaj sub la forto. Mi scias, ke la prudento rekomendas, ke, se sufiĉas la bonaj kaj pacaj manieroj, oni ne uzu drastan rimedon por atingi ion. Do mi petas la sinjorojn komisaroon kaj gardistojn, ke ili bonvolu liberigi vin kaj lasi vin pace disiri; des pli, ke ne mankos aliaj homoj, kiu servos al la reĝo en pli bonaj cirkonstancoj. Ŝajnas rigora faro meti sub la sklavecon homojn, kiujn Dio kaj la naturo volas liberaj; krome, sinjoroj gardistoj, ĉi povruloj faris al vi nenian damaĝon, do, ĉiu portu la ŝarĝon de siaj pekoj: Dio en la ĉielo ne forgesos puni la perversajn kaj rekompenci la bonajn, kaj ne decas, ke honestaj homoj rigoru al aliaj homoj, havante por tio nenian personan motivon. Mi faras ĉi peton ĝentile kaj kviete, ke mi havu, se vi ĝin plenumos, motivon por esti danka al vi; kaj se vi ne volontos, ĉi lanco kaj ĉi glavo kaj la kuraĝo de mia brako devigos vin perforte ĝin plenumi.

—Nu, kia stultaĵo! —diris la komisaroo—. Bonan amuzon kovis ĉi sinjoro ĉe la fino! Li volas, ke ni lasu la punatojn de la reĝo foriri, kvazaŭ ni havus aŭtoritaton por tiel fari, aŭ li rajtus ordoni tion. Iru via moŝto sur la vojo antaŭen kaj havu bonan sorton! Metu rekta tiun pis-poton, kiun vi portas sur la kapo, kaj ne serĉu kvin piedojn al la kato!^[105]

—Vi estas la kato, la rato kaj la renegato! —respondis don Quijote.

Kaj senplie kaj impete nia hidalgo atakis la komisaroon, sen ke li havus tempon defendi sin, kaj, grave vundante lin per la lanco, lin renversis sur la grundon. Kaj feliĉe por don Quijote, la komisaroo estis la viro kun la musketo.^[106]

Ĉe tiel neatendita evento, miro kaj konsterno frapis la aliajn gardistojn; sed denove sin reginte, la rajdanta eliris la

glavon kaj la surpiedaj la sagojn kaj impetis kontraŭ nian hidalgon, kiu kun granda aplombo atendis ilin. Kaj certe li ne eltirus sin sendifekta el tia situacio, se la galeruloj, vidante, ke prezentiĝas bela ŝanco liberigi sin, ne estus kaptintaj la okazon por disrompi la ĉenon. Tiel granda senordo ŝprucis tiam, ke la gardistoj povis fari nenion utilan, okupante sin jen pri don Quijote, kiu atakis ilin, jen pri la ĉenuloj, kiuj jam komencis deĉenigi sin.

Siaflanke Sancho helpis al la liberiĝo de Ginés de Pasamonte, kiu la unua saltis libera el la feroj sur la apertan kampon, ĵetis sin kontraŭ la kuŝanta komisaro, prenis de li la glavon kaj la musketon, kaj turnis ĉi lastan jen al unu, jen al alia gardisto, kvankam tute sen pafi, ĝis fine la gardistoj diskuris kaj perdiĝis el la vido, eskapante tiel de la musketo de Pasamonte, kiel de la multaj ŝtonoj ĵetataj al ili de la jam liberiĝintaj galeruloj.

Ĉi afero tre afliktis la ŝildiston, ĉar li komprenis, ke la forkurintoj informos al la Santa Hermandad, kiu, sonorigante alarmon.^[107] eliros persekuti la deliktulojn. Sancho sciigis tian zorgon al sia mastro kaj petis lin, ke ili ambaŭ tuj foriru kaŝi sin en la proksiman montaron.

—Tre bone —diris don Quijote—, sed en la nuna momento mi devas fari ankoraŭ ion.

Li alvokis la galerulojn, kiuj ekscitite kaj senorde iris tien kaj tien kaj jam rabis de la komisaro ĉion, lasante lin nuda. Ili ĉirkaŭis nian kavaliron kaj atendis kion li deziras ordoni al ili.

—Montri sin danka pro la favoroj ricevitaj —diris don Quijote — estas propra al homoj bon-intencaj, kaj unu el la pekoj plej ofendaj al Dio estas la sendankeco. Mi tion diras, ĉar vi jam klare vidis kaj spertis, sinjoroj, kiel mi favoris vin; kaj, por ke vi montru vian dankemon, mi volas nur, ke vi ŝarĝu

vin denove per la ĉeno, kiun mi prenis de viaj koloj, kaj tuj iru al la urbo El Toboso. Tie vi devos prezenti vin antaŭ la sinjorino Dulcinea de El Toboso, diri al ŝi, ke ŝia kavaliro, la Kavaliro de la Trista Mieno, estas ŝia servanto, kaj poste rakonti al ŝi ĉiun detalon de ĉi fama aventuro, de la komenco ĝis la momento de la liberigo tiel multe dezirata de vi. Poste vi povos iri, kien ajn vi volos.

Ginés de Pasamonte respondis je ĉies nomo, dirante:

—Kion via moŝto ordonas al ni, sinjoro kaj liberiginto nia, tute ne eblas plenumi. Ni povas iri, ne en grupo sur la vojo, sed solaj kaj disaj, ĉiu per si mem, klopodante kaŝi nin eĉ en la sinon de la tero, por ke la Santa Hermandad, kiu certe serĉos nin, ne povu nin trovi. Kion via moŝto povas kaj devas fari, estas, anstataŭigi tian servon kaj tributon al la sinjorino Dulcinea de El Toboso per nombro da *credos* kaj *avemarías*, kaj ni preĝos ilin honore al vi. Ion ĉi tian oni povas plenumi nokte aŭ tage, ripozante aŭ forkurante, en paco aŭ en milito. Sed pensi, ke ni konsentos reveni sub la ĉenon, kaj ke ni ekiros al El Toboso, egalas pensi, ke nun estas nokto, kiam ne batis ankoraŭ la deka matene. Peti de ni tian aferon, estas, kvazaŭ oni petus pirojn de ulmo.

—Nu, mi ĵuras, don filo de putino, don Ginesillo de Paropillo, aŭ kiel ajn vi nomiĝas —diris la jam koleranta don Quijote—, ke vi iros sola, kun la tuta ĉeno sur la ŝultroj kaj kun la vosto subtirita inter la kruroj.

Pasamonte jam konstatis, ke la kapo de don Quijote ne bone funkcias, se konsideri lian absurdan agon liberigi la galerujojn; krome li ne tre emis toleri insultojn, do, vidante sin tiamaniere traktita, faris okulsignon al siaj kompanoj, ili apartiĝis kaj tia pluvo da ŝtonoj komencis fali sur don Quijote, ke li ne povis ŝirmi sin tute per la ŝildo, dum la povra Rocinante reagis al la spronoj, kvazaŭ ĝi estus el

bronzo. Sancho metis sin post sia azeno kaj uzis ĝin kiel remparon kontraŭ la hajlo da ŝtonoj, sed don Quijote ne povis ŝildi sin sufiĉe bone, kaj kelkaj ŝtonoj trafis lin kun tia forto, ke ili lin renversis sur la grundon; kaj apenaŭ li falis, la studento ĵetis sin al li, demetis de sur lia kapo la barbo-pelvon, per ĝi donis al li du tri frapojn sur la dorson kaj poste du tri pliajn sur la grundon, ĝis la pelvo preskaŭ tute frakasiĝis. La galeruloj rabis de li la pelerinon, kiun li portis sur la armaĵo, kaj ne eltiris liajn ŝtrumpojn, ĉar tion ĝenis la armaĵa peco kovranta la kruojn. De Sancho ili rabis la surtuton, lasis lin duonnuda, disdonis inter si la ceterajn predojn de la batalo kaj forkuris, ĉiu dise de la aliaj, pli zorgaj eviti fali en la manojn de la timata Santa Hermandad, ol ŝarĝi sin per la ĉeno kaj sin prezenti ĉe la sinjorino Dulcinea de El Toboso. Solaj do restis la azeno kaj Rocinante, Sancho kaj don Quijote. La azeno, kap-klina kaj enpena, skuis la orelojn de tempo al tempo, kredante sendube, ke ne ĉesis ankoraŭ la tempesto da ŝtonoj ĵus siblinta ĉe ĝiaj oreloj. Rocinante kuŝis apud sia mastro, ĉar ankaŭ la ĉevalon renversis la forto de la ŝtonoj. Sancho, duonnuda, teruriĝis, pensante pri la Santa Hermandad. Kaj don Quijote sentis egan aflikton, vidante, kiel mizere traktis lin la samaj homoj, al kiuj li faris tiom da bono.

[99] La kondamniton al skurĝado oni irigis sur azeno tra difinitaj stratoj kaj samtempe oni punbatis lin. La skurĝaton ĉirkaŭis heroldo, gardistoj kaj publiko.

[100] En la epoko de Cervantes, sinonimo de «borsomakleristo», uzata ankaŭ en la senco «parigisto» aŭ «pandaro».

[101] Homo, kiu aranĝas por aliaj sekretajn am-aferojn.

[102] Esti pendumita.

[103] Cervantes kritikas, kiel aliaj verkistoj kaj kronikistoj de la epoko, la mankon de aktiveco kaj diligento de la reĝaj galeroj en la kampanjoj kontraŭ la arabaj ŝipoj.

[104] Aludo al ia friponaĵo farita de la komisaro en loko, kie la piedirantaj ĉenuloj haltis por ripozi. Kulpan konduton, en gastejo, de simila komisaro, priskribas la verkisto Mateo Alemán, samtempulo de Cervantes, en sia pikareska romano *Vivo de Guzmán de Alfarache*.

[105] Voli senprudente implikiĝi en aferon danĝeran aŭ malagrablan. Hispana proverbo.

[106] Alia preteratento de Cervantes. En la komenco de la ĉapitro li mencias du rajdantojn kun musketoj.

[107] La membroj de la Santa Hermandad devis atentigi, per la sonoriloj de la vilaĝoj, la ceterajn membrojn de la distrikto kunpersekti la fuĝantajn krimulojn.

Ĉapitro 23

Kie oni rakontas unu el la plej strangaj aventuroj de ĉi vera historio: la travivaĵojn de la fama don Quijote en Sierra Morena

Vidante sin tiel disbatita, don Quijote diris al sia ŝildisto:

—Mi ĉiam aŭdis, Sancho, ke fari bonon al malicaj egalas verŝi akvon en la maron. Mi devas suferi nun ĉi misfortunon, ĉar mi ne kredis kion vi diris. Sed kontraŭ plenumita faro ne taŭgas plendi, nur pacienci kaj rigardi ĝin kiel instruon.

—Tiom profitos via moŝto ĉi instruon, kiom mi estas turko — respondis Sancho. —Sed, ĉar vi diras, ke, se vi estus kredinta min, vi evitus ĉi misfortunon, kredu min nun kaj evitu alian eĉ pli grandan. Mi vin sciigas, ke la membroj de la Santa Hermandad havas nenian respekton al la kavalirismo, kaj ke ĉiuj vagantaj kavaliroj de la mondo gravas al ili malpli ol maravedo. Kaj sciu, ŝajnas al mi, kvazaŭ iliaj sagoj siblus preter miaj oreloj.^[108]

—Vi estas denaske timema, Sancho —diris don Quijote—. Sed, por ke vi ne diru, ke mi ĉiam obstinas kaj ne faras kion vi sugestas, ĉi-foje mi sekvos vian konsilon, retiriĝante de la furio, kiun vi tiel timas, sed nur sub la kondiĉo, ke nek viva nek morta vi diros, ke mi retiriĝis kaj apartiĝis de la danĝero pro timo. Mi tiel agas nur pro la deziro komplezi vin kaj se vi asertos alion, vi mensogos, kaj de nun ĝis tiam, kaj de tiam ĝis nun, mi dementas vin, kaj diras, ke vi mensogas kaj mensogos ĉiufoje, kiam vi diros aŭ pensos ĝin. Kaj ne plu repliku min, ĉar la nura penso, ke mi apartiĝas kaj retiriĝas de danĝero, speciale de ĉi tiu ŝajne prezentanta ian ombron

da serioza risko, puŝas min atendi sola ĉi tie, ne nur tiun Santa Hermandad, kies nomon vi mencias kun timo, sed la fratojn de la dek du triboj de Izraelo, la sep makabeojn, Kastoron kaj Polukson kaj eĉ ĉiujn fratojn kaj fratarojn de la mondo.

—Sinjoro —respondis Sancho—, retiriĝi ne signifas forkuri, kaj ne prudentas atendi danĝeron, kiam ĝi grandas pli ol la espero. La saĝaj homoj gardas sin por morgaŭ kaj ne riskas ĉion en unu sola tago. Kaj sciu, ke, kvankam kampulo sen klero kaj poluro, mi havas kelkan ideon pri la tiel nomata konvena konduto. Do ne hezitu sekvi mian konsilon, saltu sur la ĉevalon, se vi povas (se ne, mi helpos vin) kaj venu post mi. Mia iometo da inteligento diras al mi, ke ni bezonas nun la piedojn pli ol la manojn.

Don Quijote surseliĝis respondante nenion, Sancho sur la azeno ekiris ĉe la fronto kaj ili rajdis en la proksiman Sierra Morena. Sancho intencis trapasi ĝin tute, alveni al la ĉirkaŭo de El Viso aŭ de Almodóvar del Campo kaj kaŝi sin en ties krutoplenaj solejoj, tiel, ke la Santa Hermandad ne trovus ilin, se ĝi ilin persekutus. Lin animis al tio, ke la viktualio portata de la azeno saviĝis el la batalo kontraŭ la galeruloj, kion Sancho rigardis miraklo, se konsideri, ke la kondamnitoj tre serĉis kaj multon forprenis.

Ĉe la noktiĝo ili alvenis al la koro de Sierra Morena, kaj ŝajnis al Sancho, ke konvenus pasi tie, ne nur la nokton, sed eĉ kelke da tagoj, almenaŭ ĝis la finiĝo de la viktualio. Tiel do, ili tranoktis inter du rokoj, meze de multaj kverkoj. Sed la fatalo, kiu (laŭ la opinio de la homoj blindaj al la lumo de la vera Kredo) gvidas, disponas kaj aranĝas ĉion laŭ sia bontrovo, ordonis, ke Ginés de Pasamonte, la fama trompanto kaj ŝtelisto eskapinta el la ĉeno dank' al la virto kaj al la frenezo de don Quijote, kaŝu sin inter la montoj, puŝate de la timo al la Santa Hermandad, kies rigoron li

prave klopodis eviti. La sorto do kaj la timo kondukis lin al la loko, kien la samaj faktoroj puŝis nian kavaliron kaj lian ŝildiston. Ginés de Pasamonte alvenis ĝuste en la horo kaj en la momento rekoni ilin, kaj lasis ilin ekdormi; kaj pro tio, ke la malicaj ĉiam estas sendankaj, kaj ke la neceso instigas fari fiaĵojn sen zorgi pri la sekvoj, Ginés, homo nek dankema nek bonintenca, decidis ŝteli la azenon disde Sancho Panza, kaj ignoris la ĉevalon, ĉar li juĝis ĝin apenaŭ vendebla aŭ lombardebla. Sancho Panza dormis, Ginés ŝtelis la azenon kaj, antaŭ ol la mateno leviĝis, li troviĝis jam ekster atingo. Aperis la aŭroro kaj plenigis per ĝojo la surfacon de la tero kaj per aflikto la koron de Sancho, tial, ke li ne vidis la azenon. Kaj kiam li konstatis, ke ĝi tute mankas, li komencis la plej doloran kaj tristan veadon kaj ploradon de la mondo. Ĉe tio don Quijote vekiĝis kaj aŭdis lin diri:

—Ho, filo de mia karno, naskito en mia propra hejmo, amuzo de miaj filoj, plezuro de mia edzino, envio de miaj najbaroj, rimedo de miaj ŝarĝoj kaj, fine, provizanto de la duono de mia persono, ĉar per la dudek ses maravedoj, kiujn vi lukris ĉiutage, kovriĝis la duono de mia buĝeto!

Don Quijote demandis al la ŝildisto, kial li ploras, kaj, informite pri la kaŭzo, konsolis la ŝildiston kiom li povis kaj promesis doni al li mandaton, por ke li ricevu ĉe li tri el liaj kvin azenoj. La ŝildisto konsoliĝis per tio, viŝis al si la larmojn, ĉesigis la plorĝemojn kaj dankis la favoron al don Quijote,^[109] kiu, vidante sin meze de la montoj, ĝojis en la koro, ĉar ili ŝajnis al li plej adekvataj por liaj aventuroj. Venis al li en la memoron la mirindaj aferoj okazintaj al la vagantaj kavaliroj en similaj lokoj aspraj kaj senhomaj, kaj tiel absorbis kaj distris lin tiaj pensoj, ke pri nenio alia li konsciis. Rilate al Sancho, de kiam li imagis, ke ili estas jam ekster danĝero, li havis nur la zorgon kontentigi la stomakon per la restoj de la klerika predo, kaj, sub la pezo de la ŝarĝo antaŭe portata de la azeno, li iris post sia mastro kaj de tempo al

tempo elprenis el la dusako partojn de la viktualio kaj ilin tragorĝis en la ventron; kaj, tiel okupata, li ne donus eĉ unu maravedon por ajna aventuro. Ĉe tio li levis la rigardon kaj vidis, ke lia mastro haltis kaj ke per la pinto de la lanco li klopodas levi ligaĵon de sur la grundo. Sancho rapide iris helpi lin kaj alvenis en la momento, kiam don Quijote tenis per la lanco unu valizon alkroĉitan al kuseno; tiom pezis la tuto, disfalanta kaj komplete aŭ parte putra, ke Sancho devis deseliĝi^[110] kaj preni ĝin. Lia mastro petis lin rigardi la enhavon de la valizo, la ŝildisto tuj obeis kaj, kvankam ĝi estis fermita per ĉeno kun pendoseruro, li povis vidi tra la putraj partoj, ke en ĝi kuŝas kvar ĉemizoj el fajna batisto kaj alia tolaĵo pura kaj bela. Krome li trovis en kunnodita naztuko amaseton da oraj eskudoj kaj, ilin vidante, li diris:

—Estu benata la ĉielo, kiu fine sendas al ni profitan aventuron!

Kaj plu serĉante li trovis etan notolibron riĉe ornamitan. Don Quijote petis ĝin kaj ordonis la ŝildiston konservi la monon kiel propran. Sancho kisis al li la manojn pro la favoro, elvalizigis la tolaĵon kaj ĝin metis en la dusakon de la viktualio. Tion vidante, diris don Quijote:

—Ŝajnas al mi, Sancho, kaj ne eblas alio, ke iu vojaĝanto eraris la vojon inter la montoj, kaj ke la latronoj prirabis kaj murdis lin kaj poste lin enterigis en ĉi loko tiel dezerta.

—Neeble —respondis Sancho—. La latronoj ne forgesus preni la monon.

—Vi pravas —diris don Quijote—. Mi do nek divenas, nek suspektas, kio vere okazis. Sed atendu, ni vidu, ĉu en la noto-libro aperas io skribita donanta al ni spuron. Per ĝi ni povus scii kion ni deziras.

Don Quijote apertis la libron, trovis la malneton, en bela kaligrafio, de soneto, kaj legis ĝin laŭte, por ke Sancho aŭdu. La soneto tekstis jene:

Aŭ mankas al la amo komprenemo,
aŭ tro tirane ĝi al mi kruelas,
ĉar la doloro, kiu min muelas,
turmentas min kun nekredebla premo.

Se amo estas dio, jen problemo:
se l' dioj ĉiam fari bonon celas,
do kiu min senkonsidere pelas
en ĉi dolor' ĝuata ĝis ekstremo?

Ne povas esti vi, karega Fili,
ĉar vi tro bonas por malico bata.
Kaj el ĉiel' ne venas ĉi ruino.

En tombon baldaŭ devos mi azili,
ĉar por malsan' de kaŭzo nekonata
ne taŭgus eĉ mirakla medicino.

—La versoj klarigas nenion —diris Sancho—, escepte se la *hilo*^[111] nin direktas al la bobeno.

—Pri kiu *hilo* vi parolas? —demandis don Quijote.

—Ŝajnas al mi, ke via moŝto menciis ian *hilo*.

—Mi diris, ne «hilo», sed «Fili» —respondis don Quijote—, kaj certe nomiĝas tiel la sinjorino, pri kies amo plendas la aŭtoro de ĉi soneto. Kaj, aŭ mi ne scias ĝuste aprezi la poezion, aŭ li estas bona poeto.

—Ĉu via moŝto scias ankaŭ pri la arto de la versoj? —demandis Sancho.

—Eĉ pli ol vi pensas —respondis don Quijote—, kaj vi tion konstatos, kiam vi portos leteron tute versan al mia sinjorino Dulcinea de El Toboso. Sciu, Sancho, ke ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj vagantaj kavaliroj de la pasinta epoko, estis grandaj trobadoroj kaj ankaŭ grandaj muzikantoj. Kaj ĉi duobla talento, pli ĝuste, ĉiela graco, kunekzistas kun la kavaliroj-amantoj, kvankam verdire, la poemoj de la antikvaj kavaliroj havas pli da spirito ol da eleganto.

—Bonvolu plu legi —diris Sancho—. Eble vi trovos ion pli interesan.

Don Quijote turnis la paĝon kaj diris:

—Jen prozo. Ŝajne, letero.

—Ordinara letero, sinjoro? —demandis Sancho.

—Laŭ la unuaj linioj, temas pri am-letero —respondis don Quijote.

—Legu ĝin laŭte do —diris Sancho—. Al mi tre plaĉas la amaj temoj.

—Kun plezuro —respondis don Quijote. Kaj laŭte, kiel la ŝildisto petis, li legis jene: «Via falsa promeso kaj mia certa misfortuno gvidas min al loko, de kie la novaĵo de mia morto alvenos al vi pli frue ol la motivoj de miaj plendoj. Vi, ho sendanka, forlasis min por viro pli riĉa, sed ne pli merita ol mi, kaj se la virto estus tiel estimata kiel la riĉo, mi envidus nenies havon kaj ne priplorus nun mian propran misfortunon. Kion via beleco konstruis, viaj faroj detruis. Pro la ravo via, mi juĝis vin anĝelo; pro via konduto mi komprenis, ke vi estas nur virino. Vivu pace, vi, rompinte la pacon mian, kaj la ĉielo volu, ke la trompoj de via edzo ĉiam kuŝu sub vualo, por ke vi ne bedaŭru poreterne vian faron, kaj mi ne plenumu venĝon, kiun mi ne deziras».

Leginte la leteron, diris don Quijote:

—Per ĉi letero ni scias malpli pri ties skribinto ol per la poemo. Oni povas konkludi nur, ke li estas amanto disdegnata.

Li foliumis preskaŭ la tutan libreton, kie sidis aliaj poemoj kaj leteroj, kelkaj legeblaj, kelkaj ne, sed kies sola temo konsistis el plendoj, lamentoj, suspektoj, deziroj kaj ĉagrenoj, favoroj kaj disdegnoj, jen en panegira, jen en trista tono. Don Quijote ekzamenis la libron kaj dume Sancho fosis, priserĉis, esploris, kaj trarigardis en la valizo ĝis la lasta anguleto, kaj rompis ĉiun kudron kaj plukis aparte ĉiun lanan flokon de la kuseno, ĉar li ne volis preteratenti ion valoran pro senzorgo kaj manko de diligento: tian avidon vekis en li la trovo de la eskudoj en la naztuko, en la nombro de pli ol cent. Kvankam li trovis neniom plian, li pensis, ke la menciitaj eskudoj, pli ol sufiĉe kompensas la bernadon, la vomon de la pocio, la karesojn de la vergoj, la pugnobatojn de la mulisto, la mankon de la dusako kaj la priwabon de la surtuto, krom la malsato, la soifo kaj la laco, kies pezon li eltenis je la servo de sia bona mastro. Kaj eĉ ŝajnis al li, ke oni pagis al li supermezure, kiam don Quijote grandanime donacis al li la trovitan monon.

La Kavaliro de la Trista Mieno havis fortan deziron scii, kiu estas la mastro de la valizo, kaj konkludis el la soneto, la letero, la oraj eskudoj kaj la tiel bon-kvalitaj ĉemizoj, ke certe temas pri granda sinjoro, kies damo per disdegnoj kaj mistraktoj puŝis lin al fatala fino. Sed pro tio, ke en tiel aspra kaj dezerta lando vidiĝis eĉ ne unu sola homo povanta lin informi, li ekzorgis rajdi plu kaj lasis la ĉevalon elekti la vojon laŭ sia bontrovo (Rocinante sekvis do la plej facile ireblan) dum lia fantazio ĉiam kroĉiĝis al la penso, ke inter tiuj veproj ne povos ne okazi ia stranga aventuro. Rajdante kun ĉi ideo, li vidis ke sur la supro de monteto rekte antaŭ li,

unu viro saltas de roko al roko kaj de arbusto al arbusto kun eksterordinara rapido. Don Quijote perceptis lin preskaŭ nuda, kun densa kaj nigra barbo, longa kaj senorda hararo, nudaj kruroj kaj piedoj, kaj kun la femuroj en kuloto ŝajne velura, sed tiel kaduka, ke lia haŭto vidiĝis tra multaj ŝiroj kaj rompoj; li havis ankaŭ la kapon nuda kaj, kvankam li pasis tre rapide, kiel menciite, tamen la Kavaliro de la Trista Mieno vidis kaj rimarkis tiel grandan nombron da detaloj. Li faris laŭpove por sekvi lin, sed ne sukcesis, ĉar Rocinante tro feblis por paŝi vigle sur tiel aspraj lokoj, des malpli, ke ĝi havis flegman kaj lanteman naturon. Don Quijote, tuj imagante, ke la forsaltinta homo estas la mastro de la valizo kaj la kuseno, faris al si la decidon serĉi kaj trovi lin, eĉ se li pasus en tio unu jaron. Tiel do li ordonis la ŝildiston desalti de la azeno kaj esplori unu flankon de la monto, dum li esploros la alian, ĉar tiel ekzistis la ŝanco, ke ili povus denove renkonti la homon tiel rapide forkurintan.

—Mi ne povas fari tion —diris Sancho—. Tuj kiam mi apartiĝas de via moŝto, min atakas la timo per mil alarmoj kaj vizioj. Kaj ĉi vortoj miaj taŭgu al vi kiel averto, ke de nun mi ne disiĝos de vi eĉ unu harlarĝon.

—Faru laŭvole —diris la Kavaliro de la Trista Mieno—. Al mi donas kontenton, ke vi fidas mian kuraĝon. Neniam ĝi mankos al vi, eĉ se via animo elglitos el via korpo. Kaj nun venu post mi, lante aŭ kiel ajn vi povos, kaj uzu la okulojn kiel lanternojn. Ĉirkaŭante la monton, eble mi trafos la homon, kiun ni vidis, kaj kiu sendube estas la mastro de nia trovo.

—Prefere ne serĉi lin —respondis Sancho—, ĉar, se ni lin renkontos, kaj al li apartenas la mono, evidentas, ke ni devos ĝin redoni. Do anstataŭ tiel nenecese klopodi, estus pli bone fidele konservi ĝin kaj atendi ĝis ĝia mastro aperos ne tiel baldaŭ kaj en maniero pli ordinara. Eble li aperos, ĝuste

kiam mi finas elspezi la eskudojn, kaj tiam, laŭ la reĝa leĝo, mi estas kvita de respondeco.

—Vi trompiĝas, Sancho —respondis don Quijote—. De la momento, kiam ni suspektas, ke li estas la mastro, kaj ke ni havas lin preskaŭ sub nia vido, ni havas la devon serĉi lin kaj redoni al li ties apartenaĵon; kaj, se ni ne serĉas lin, nia preskaŭ konvinko pri lia identeco igas nin tiel kulpaj, kvazaŭ li estus sen ia dubo la proprietulo de la mono. Do amiko Sancho, ne ĉagreniĝu serĉante lin kaj pensu, kiel faciliĝos al mi la koro, se ni renkontos lin.

Li spronis la ĉevalon, Sancho sekvis lin piede kaj ŝarĝite dank' al Ginesillo de Pasamonte kaj, parte ĉirkaŭirinte la monton, ili renkontis mulon kun selo kaj bridoj kuŝantan en ravineto, senvivan, duonvoritan de hundoj kaj pikitan de garoloj, kaj ĉio ĉi plifirmigis en ili ties opinion, ke la forsaltinto estas la proprietulo de la valizo kaj de la mulo.

Rigardante la senvivan beston, ili aŭdis fajfon, kian faras paŝtisto, kiam li gardas gregon, kaj subite, dekstramane aperis granda nombro da kaproj kaj poste, sur la supro de la monto, olda paŝtisto ilin gardanta. Don Quijote laŭte vokis lin, petante lin subiri kaj veni al ili. La alia krie demandis, kio prenis ilin al tia loko, apenaŭ aŭ neniam vizitata, escepte de kaproj, aŭ de lupoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj tie kutime vagantaj. Sancho respondis, petante lin subiri, kaj promesante ĉion klarigi al li. La kapristo subiris, venis ĝis don Quijote kaj diris:

—Mi vetas, ke vi rigardas la senvivan lu-mulon de la ravino; verdire jam de ses monatoj ĝi kuŝas tie. Ĉu eble vi renkontis ĝian mastron?

—Neniun ni renkontis —respondis don Quijote—, sed trovis, je kelka distanco de ĉi tie, valizon kaj kusenon.

—Ankaŭ mi ilin vidis —respondis la kapristo—, sed neniam volis preni ilin, nek eĉ proksimiĝi al ili, ĉar mi timis fari ion nedecan, aŭ vidi min akuzita pri ŝtelo. La diablo ja subtilas, antaŭ la piedoj de la homoj leviĝas tuberoj kaj, sen scii kiel aŭ kial, oni stumblas kaj falas.

—Mi pensas ĝuste tion saman —diris Sancho—. Ankaŭ mi vidis la valizon kaj ne volis proksimiĝi al ĝi eĉ en la distanco de ŝton-ĵeto. Tie mi lasis ĝin netuŝita pro tio, ke mi ne volas hundon kun tintilo.^[112]

—Diru, amiko, ĉu vi konas la mastron de la valizo? —demandis don Quijote.

—Mi scias nur —respondis la kapristo—, ke antaŭ proksimume ses monatoj alvenis al paŝtista kabano, staranta naŭ mejlojn de ĉi tie, junulo de belaj kresko kaj mieno sur la sama mulo, kies kadavro tie kuŝas, kaj li portis la saman valizon kaj la saman kusenon, kiujn laŭ via diro, vi vidis, sed ne tuŝis. Li demandis nin, kie situas la parto plej aspra kaj sovaĝa en ĉi montaro, kaj ni respondis, ke ĉi tie, kie ni staras nun, kaj mi diras la veron, ĉar se vi penetrus eĉ nur unu plian mejlon, eble vi ne sukcesus reveni. Cetere mi miras, kiel vi povis atingi ĉi tien, ĉar nek vojoj nek padoj direktiĝas al ĉi loko. Nu, mi diras, ke aŭdinte nian respondon, la junulo sin turnis, ekrajdis al la direkto, kiun ni montris al li, kaj lasis nin ravitaj de lia alloga mieno kaj surprizitaj de lia demando kaj de lia hasto iri en la denson de la montaro. De tiam ni ne revidis lin ĝis, antaŭ kelkaj tagoj, li subite aperis fronte al kapristo, ĵetis sin al li, donis al li grandan nombron da piedkaj pugno-batoj, alsaltis al nia viktuali-azeno, prenis de ĝi la tutan panon kaj fromaĝon troveblan, kaj kun mirinda rapido kuris denove rifuĝi en la montaron. Sciiĝinte pri la afero, mi kaj kelkaj aliaj kapristoj serĉis lin preskaŭ du tagojn en la makiso kaj fine lin trovis kaŝita en la kava trunko de ega kverko. Li elpaŝis al ni kun granda humilo, kun la vesto ŝirita

kaj kun la vizaĝo transformiĝinta kaj tanita de la suno, tiel, ke ni apenaŭ konis lin, kaj nur dank' al lia vesto, ĉifona sed ankoraŭ rekonebla, ni konvinkiĝis, ke li estas la serĉato. Li tre ĝentile salutis nin, lakone kaj milde diris nin ne miri pri lia aspekto kaj stato, ĉar li devas tiamaniere plenumi pentofaron pro siaj multaj pekoj. Ni petis lin diri, kiu li estas, sed ni ricevis nenan respondon ĉi-rilate; poste ni demandis al li, kie ni povus lin renkonti por volonte kaj plezure porti al li manĝon, ĉar sen ĝi li ne povus elteni. Kaj se tio ne plaĉus al li, almenaŭ (ni aldonis) li devus pace eliri al ni peti manĝon, ne preni ĝin perforte. Li dankis al ni nian proponon, petis pardonon pro la pasinta agreso kaj promesis por la futuro peti la manĝon je la nomo de Dio, molestante neniun. Rilate al lia loĝejo, li diris, ke li havas nur kian la ŝanco proponas al li en ĉiu nokto, kaj li finis sian paroladon per tiel tenera ploro, ke ni estus el ŝtono, se ni ne plorus kun li vidante kiel terure ŝanĝiĝis lia aspekto, de kiam ni renkontis lin la unuan fojon. Ĉar, kiel dirite, temis pri tre ĉarma kaj agrabla junulo, kaj lia ĝentilo kaj eleganta parolmaniero montris lin tre kavalireca persono naskita en honorinda familio. Kvankam ni estas krudaj kampuloj, lia ĝentilo tiel grandis, ke, kiam ni aŭskultis lin, lian distingitecon ne povus ne rimarki eĉ la plej simpla kapristo. Nu, en la plej bela parto de sia parolado, li subite silentiĝis, fiksas la rigardon al la grundo kelkan tempon kaj ni atendis streĉe kaj alarme, sed ankaŭ kun kompata koro, kiel finiĝos lia enmemiĝo. Tiel longe li tenis apertaj la okulojn kun palpebroj senmovaj, tiel li kunpremis la lipojn kaj sulkis la brovojn, ke ni facile komprenis, ke li suferas atakon de frenezo. Liaj agoj baldaŭ montris la veron de niaj pensoj: li leviĝis kolere de la grundo, kien li antaŭe ĵetis sin, agresis la viron plej proksiman kun senbrida furio, kaj nur pro tio, ke ni lin retenis, li ne mortigis nian kompanon per mordoj kaj batoj. Kaj dume li ne ĉesis krii: «Ho, perfida Fernando, nun vi pagos al mi la konton de viaj abomenaĵoj. Ĉi manoj elŝiros el vi la koron, kie sidas ĉiuj malbonoj, ĉefe la trompo kaj la fraŭdo». Kaj per similaj

esprimoj li plu insultis tiun Fernandon kaj akuzis lin pri perfido kaj falso. Plenaj de aflikto ni apartigis lin do de la agresato, kaj la junulo sen diri eĉ unu vorton, forkurante, forlasis nin kaj sin kaŝis inter ĉi vepro kaj arbustoj, tiel ke ni ne povis sekvi lin. El tio ni konkludis, ke la frenezo lin posedas nur de tempo al tempo, kaj ke ia Fernando certe malicis al li per tre abomena fiaĵo, se konsideri lian kompatindan staton. Ĉio ĉi konfirmiĝis de tiam, ĉar li ofte aperas subite, foje por peti de la kapristoj iom da manĝo, foje por preni ĝin perforte. Kiam la frenezo lin puŝas, li agresas la paŝtistojn kaj forŝiras de ili la viktualion, eĉ se ili bonvole proponas ĝin al li. Sed, kiam lia menso funkcias normale, li petas la manĝon je la amo de Dio, ĝentile kaj humile, kaj ricevas ĝin kun dankoj kaj kun larmoj. Nu, sinjoroj —daŭrigis la kapristo—, hieraŭ mi kaj kvar junaj paŝtistoj, du el ili servistoj miaj, kaj kompanoj la du aliaj, decidis serĉi lin, kaj, kiam ni lin trovos, ni lin kondukos, ĉu li volos, ĉu ne, al la vilaĝo Almudévar, proksimume dudek du mejlojn de ĉi tie. Se lia malsano kuraceblas, oni resanigos lin tie, kaj almenaŭ, li diros al ni en siaj momentoj de konscio, kiu li estas, kaj, ĉu li havas familion, al kiu ni povus informi pri lia misfortuno. Nur tion, sinjoroj, ni povas respondi al viaj demandoj. Kaj sciu: la objektoj de vi trovitaj apartenas al la persono rapid-kura kaj preskaŭ nuda, kiun vi rimarkis —ĉar don Quijote jam antaŭe diris al la kapristo, ke ili vidis viron salti de roko al roko.

Don Quijote miris je la rakonto de la kapristo, kreskis en li la deziro koni la identecon de la junulo kaj pli firmiĝis lia antaŭa ideo serĉi lin tra la tuta montaro, lasante nenian truon nek kavon neesplorita. Sed la sorto helpis pli ol don Quijote pensis kaj esperis, ĉar en tiu sama momento aperis subite en gorĝo de la monto la serĉata junulo kaj sin direktis al la loko, kie ili troviĝis. Li parolis al si mem vortojn eĉ de proksime nekompreneblajn, des malpli de kelka distanco. Lia vesto konformis al la jam menciita priskribo, escepte ke,

kiam li proksimiĝis, don Quijote rimarkis, ke li portas ĉifonan sed ambre parfumitan specon de leda tuniko,^[113] kaj el tio nia hidalgo konkludis, ke persono en tia vesto ne povas esti de suba rango. La junulo alvenis al ili kaj salutis per voĉo raŭka kaj nenatura sed kun granda ĝentilo. Don Quijote reciprokis al li la salutojn ne malpli ĝentile, desaltis de Rocinante kaj kun gracia kaj brava sinteno lin brakumis kaj forte retenis lin kelkan tempon en siaj brakoj, kvazaŭ ili estus amikoj de multaj jaroj. La junulo, kiun oni povus nomi «la Ĉifonulo de la Aĉa Mieno», kiel don Quijote nomiĝis de la Trista, lasis sin brakumi, iom retropaŝis, metis la manojn sur la ŝultrojn de nia hidalgo, rigardis lin, kvazaŭ li pensus, ĉu li konas lin, kaj sendube miris pri la figuro, vizaĝo kaj armaĵo de don Quijote, tiel multe, kiel ĉi-lasto miris rigardante lin. Post la brakumo, la ĉifonulo parolis unua kaj diris kion oni rakontas en la sekvanta ĉapitro.

[108] La Santa Hermandad ekzekutis la krimulojn, pafante sagojn kontraŭ ilin.

[109] La ŝtelo de la azeno estis inkludita en la dua eldono de 1605, de Juan de la Cuesta. En la unua eldono ĝi mankis, pro pretervido de Cervantes aŭ de la presisto.

[110] Sed Ginés de Pasamonte ŝtelis de li la azenon iom pli frue. Ĉi tie, kaj en alia alineo de ĉi sama ĉapitro, Cervantes preteratentis la ŝtelon.

[111] Hispane «fadeno».

[112] Repuŝi ion ŝajne bonan aŭ profitan, sed kiu efektive kaŭzas ĝenon aŭ malutilon.

[[113](#)] En la tanado de iaj ledoj oni uzis ankaŭ ambron, kaj tio donis distingitecon al la vestaĵoj per ili faritaj.

Ĉapitro 24

Kun la daŭrigo de la aventuro en Sierra Morena

Diras la historio, ke don Quijote atentege aŭskultis la ĉifonan Kavaliron de la Montoj, kiu sin turnis al li kun la jenaj vortoj:

—Vere, sinjoro, kiu ajn vi estas, ĉar mi ne konas vin, mi dankas vian ĝentilon kaj dezirus troviĝi en la situacio povi esprimi per pli ol nuraj vortoj mian dankon pro tio, ke vi tiel bele min akceptis. Sed la sorto volis doni al mi nenion por repago de la bonaĵoj al mi faritaj, krom la deziro ilin reciproki.

—La deziro mia —respondis don Quijote— estas servi vin, ĝis tia grado, ke mi decidis ne foriri de ĉi montoj antaŭ ol renkonti vin kaj scii de vi mem, ĉu oni povus trovi, kaj se necese serĉi plej urĝe, ian efikan rimedon kontraŭ la aflikto, kiu, kiel montras via stranga viv-maniero, vin turmentas. Kaj se via misfortuno estus tia, ke ĝi barus la paŝon al ĉia konsolo, mi intencis laŭpove helpi vin, priplorante kaj lamentante kun vi, ĉar oni sentas tamen kelkan konsolon en siaj malfeliĉoj, kiam alia persono afliktiĝas pro ili. Kaj se mia bona intenco meritas repagon per ĝentilaĵo, mi petas vin, sinjoro, je via videble granda ĝentilo, kaj je la persono de vi plej amata en la mondo, ke vi diru, kiu vi estas, kaj kio vin puŝis vivi kaj morti kiel la animaloj, ĉar vi loĝas inter ili tiel sinforgese, kiel via vesto kaj via persono montras. Mi ĵuras je la ordeno kavalira, kie mi servas, kvankam mi estas nedigna pekulo, kaj je mia profesio de vaganta kavaliro, ke se vi, sinjoro, komplezos min ĉi-rilate, mi servos vin kun la sindono postulata de mia stato, aŭ portante rimedon al via misfortuno, se rimedo ekzistas, aŭ kunplorante kun vi, kiel promesite.

La Kavaliro de la Arbaro, aŭdinte paroli tiamaniere la Kavaliron de la Trista Mieno, nur rigardis lin foje kaj refoje de la kapo ĝis la piedoj, kaj, kiam li satiĝis rigardi, li diris:

—Se vi havas ian manĝon por mi, jam donu ĝin, je la amo de Dio, kaj nur post ol mi manĝos, mi faros laŭ via plaĉo repage por la bonaj sentoj al mi montrataj ĉi tie.

Sancho elprenis el sia dusako, kaj la kapristo el la sia, ion por kontentigi la malsaton de la ĉifonulo, kiu manĝis tiel haste, ke li apenaŭ paŭzetis inter mordo kaj mordo, ĉar, pli ol maĉi, li glutis, dum la personoj lin akompanantaj diris eĉ ne unu vorton. Kiam la junulo finis manĝi, li signis, ke oni sekvu lin, kaj li gvidis ilin al verda kaj eta herbejo situanta trans proksima rokego. Tie li kuŝiĝis sur la herbo, la aliaj imitis lin en silento, la ĉifonulo aranĝis sin pli komforte kaj diris:

—Se vi deziras, ke mi koncize sciigu al vi, sinjoroj, la enormon de miaj misfortunoj, vi devas promesi ne interrompi la fadenon de mia trista historio per ajna demando aŭ rimarko, ĉar, en la sama momento kiam vi tion farus, la historio finiĝus.

Ĉi averto de la ĉifonulo vekis en la memoro de don Quijote la rakonton de la ŝildisto kaj tion, ke ĝi finiĝis, ĉar li ne sciis la ĝustan nombron de la kaproj pasintaj trans la riveron. Nu, la ĉifonulo daŭrigis jene:

—Mi tion avertas, ĉar mi deziras fini kiel eble plej rapide la rakonton de miaj misfortunoj. Rememori ilin faras ilin pli doloraj, kaj ju malpli da demandoj vi formulos, des pli frue mi venos al la fino de mia historio. Cetere mi preterlasos nenion gravan por plene kontentigi vian scivolon.

Don Quijote promesis je ĉies nomo ne interrompi lin, kaj tiel trankviligita, la ĉifonulo komencis:

—Mia nomo estas Cardenio; mia naskoloko, unu el la plej bonaj urboj ĉi tie, en Andaluzio; mia familio, nobela; miaj gepatroj, riĉaj; mia misfortuno, tiel granda, ke miaj gepatroj kaj familio priploris ĝin, sen ke ili povus trovi al ĝi rimedon per siaj riĉoj, ĉar por kuracado de misfortunoj venantaj de la ĉielo, la bonhaveco apenaŭ valoras. En la sama urbo vivis anĝelino, kaj Amoro metis en ŝin la tutan gloron, kiun mi povus deziri: tiel eksterordinara estis la belo de Luscinda, pucelo same nobela kaj riĉa kiel mi, sed pli bonsorta, kaj ankaŭ malpli konstanta ol meritis amo tiel honesta kiel la mia. Ĉi Luscindan mi amis, deziris kaj adoris jam de miaj fruaj kaj verdaj jaroj, kaj ŝi amis min naive kaj sincere, konforme al sia juna aĝo. Niaj gepatroj sciis pri nia reciproka inklino kaj ne oponis al ĝi, ĉar ili klare vidis, ke kiam ĝi maturiĝus, ĝi devus konduki nin al geedziĝo, al kies konveneco kontribuis ankaŭ la sama rango de niaj familioj kaj de niaj riĉoj. Ni kreskis, kaj tiel kreskis samtempe nia reciproka amo, ke la patro de Luscinda pensis, ke en obeo al la konvencioj, li devas ne lasi min eniri en la domon, imitante tiel la gepatrojn de tiu Tisba ofte prikantata de la poetoj. Nu, lia malpermeso nur aldonis flamon al flamo kaj deziron al deziro, ĉar, kvankam oni silentigis al ni la langon, tamen oni ne povis haltigi la plumojn, kies strekoj, pli libere ol la langoj, konfesas al la amata persono la plej sekretajn pensojn de la animo, pro tio, ke ofte okazas, ke en la ĉeesto de la persono amata mutiĝas en konfuzo la plej rezoluta intenco kaj la plej aŭdaca lango. Ho Dio, kiel multe da leteroj mi skribis al ŝi! Kiel dolĉe kaj delikate ŝi respondis! Kiel multe da kanzonoj kaj da amaj versoj mi verkis! Per ili mia koro deklaris kaj rivelis sian senton, pentris la ardon de sia deziro, refreŝigis sian memoron kaj ĝuis sian inklinton. Nu, finfine, jam senpacienca kaj konsumita de la deziro vidi ŝin, mi faris tion, kio ŝajnis al mi pli konvena por la atingo de mia dezirata kaj meritita premio: peti ŝian patron, ke li donu ŝin al mi edzinige. Li respondis, ke li dankas min pro mia bona dispozicio honori lin kaj pro mia deziro honori min mem per

lia amata filino, kaj aldonis, ke mia propra patro, estante viva, devus laŭ la reguloj de la deco formuli la peton, ĉar Luscinda ne estis virino prenebla aŭ donebla ŝtele kaj submane. Mi dankis lin pro la ĝentilo, pensis, ke li pravas, kaj ke mia patro konsentus mian projekton, tuj kiam mi sciigus lin. Tiel do, mi iris informi lin kaj, enirante en la ĉambron, kie li sidis, mi trovis lin kun aperta letero en la manoj. Antaŭ ol mi povus paroli, li ĝin donis al mi, dirante:

»—Ĉi letero montros al vi, Cardenio, ke duko Rikardo bonvolas fari al vi favoron.

»Kiel vi, sinjoroj, certe scias, duko Rikardo estas grandulo de Hispanujo kaj havas sian duk-landon en la pli riĉa parto de ĉi Andaluzio. Mi prenis kaj legis la leteron, kaj ĝi tiel plenis de komplezemo kaj bonvolo, ke eĉ mi mem pensis, ke mia patro aĉe kondukus, se li ne plenumus la peton de la duko, nome, sendi min al la loko, kie la duko loĝis, por ke mi estu, ne servisto, sed kompano de lia pli aĝa filo. La duko promesis atribui al mi la postenon respondan al lia alta opinio pri mi. Legante la leteron mi konsterniĝis, des pli, kiam mi aŭdis mian patron diri:

»—Postmorgaŭ vi ekiros, Cardenio, kaj faros kion la duko deziras. Kaj danku Dion, ke Li metas vin sur vojon kondukantan al celo, kiun, mi scias, vi meritas.

»Al tio li aldonis aliajn patrajn konsilojn. La dato de mia foriro alvenis, sed la antaŭan nokton mi parolis kun Luscinda kaj informis ŝin pri ĉio okazanta. La samon mi diris ankaŭ al ŝia patro kaj petegis lin atendi kelke da tagoj kaj ne disponi pri sia filino, ĝis mi vidos kion duko Ricardo vere volas de mi. Li promesis tion fari, kaj Luscinda konfirmis sian amon al mi per mil ĵuroj kaj mil svenetoj. Fine mi alvenis al la palaco de la duko, kaj li akceptis kaj traktis min tiel bone, ke la envio komencis ludi sian rolon. La oldaj servistoj enviis min, ĉar ili

pensis, ke la duko, favorante min, damaĝas ilin. Tamen unu persono tre ĝojis pro mia alveno: la dua filo de la duko, nomata Fernando, junulo distingita, eleganta, sindona kaj enamiĝema. Preskaŭ dekomence li tiel deziris amikiĝi al mi, ke tio vekis ĉies komentojn, kaj kvankam lia pli aĝa frato estimis kaj favoris min, tamen li ne evidentigis la ekstreman amon kaj komplezemon de Fernando al mia persono. Nu, bone, la alta estimo de don Fernando turniĝis en veran amikecon, kaj tial, ke inter amikoj ne ekzistas sekretoj, li rivelis al mi ĉiun personon sian kaj precipe menciis am-aferon, kiu kaŭzis al li ioman zorgon.

»Li tre amis la filinon de riĉa kampulo, farmisto de la duko, kaj ŝi estis tiel same bela, virta, saĝa kaj diskreta, ke la homoj ŝin konantaj ne povus decidi, per kio ŝi plej brilas. Ĉi bonaj kvalitoj de la ĉarma kampulino tiel flamigis la koron de don Fernando, ke por venki ŝian virton kaj ŝin posedi, li antaŭdecidis doni al ŝi promeson de edziĝo, ĉar li sciis, ke alie li tute fiaskus. Urgate de amikaj sentoj, mi uzis miajn plej bonajn rezonojn kaj menciis ĉiun instruan ekzemplon, kiun mi konis, por deturni lin de tia projekto. Sed vidante, ke miaj klopodoj vanis, mi intencis informi pri la afero lian patron, la dukon Ricardo.

»Nu, don Fernando, sagaca kaj inteligenta, suspektis kaj timis mian intencon, ĉar li pensis, ke mi, kiel lojala subulo, ne povus kaŝi antaŭ mia sinjoro la duko ion tiel damaĝan al ties honoro. Tiel do, kun la celo konfuzi kaj trompi min, li diris al mi, ke, por ke la belulino tiel forte lin sorĉanta ne plu obsedu lin, la plej bona rimedo konsistus en tio, foresti kelkajn monatojn. Li aldonis, ke li volus ilin pasigi kun mi ĉe mia patro, kaj ke li dirus al la duko, kiel pretekston de la vojaĝo, ke okaze de la foiro li deziras iri al mia urbo por aĉeti ĉevalojn, ĉar tie troviĝas la plej bonaj de la mondo. Tuj kiam mi aŭdis lin, mi pensis lian ideon plej trafa, kvankam mi pensus ĝin tia, eĉ se ĝi estus malpli bona, ĉar ĝi donis al mi

belan okazon revidi mian Luscindan. Sub la influo de tiaj penso kaj deziro mi aprobis lian projekton kaj urĝis lin tuj ĝin efektiviĝi, dirante al li, ke vere la foresto efikas kontraŭ la plej firma amo.

»Sed okazis, kiel mi sciiĝis poste, ke, kiam li proponis al mi la menciitan projekton, li jam antaŭe ĝuis la favorojn de la kampulino sub la promeso edziĝi al ŝi kaj nun li atendis la okazon riveli la aferon en konvena momento kaj sendanĝere, ĉar li timis la reagon de la duko, lia patro, kiam li sciiĝus pri lia frenezaĵo. Nu, kiel sciante, la amo inter junuloj estas pliparte ne amo, sed lasciva apetito, kiu, kiam ĝi satiĝas per la volupto, mortas, kaj kio ŝajnas amo velkas, ĉar ĝi ne povas daŭri trans siaj naturaj limoj, kiuj limoj ne ekzistas en la vera amo. Mi volas diri, ke, kiam don Fernando frandis la kampulinon, baldaŭ liaj deziroj ŝrumpis kaj lia ardo estingiĝis, kaj se unue li ŝajnis, ke li volas foresti por ilin rezisti, nun li vere volis vojaĝi por ne plenumi ilin. La duko donis al li la forpermeson kaj ordonis, ke mi akompanu lin. Ni alvenis al mia urbo, mia patro akceptis don Fernandon konforme al ties rango, poste mi vizitis Luscindan kaj denove vivis miaj deziroj, kvankam ili neniam mortis nek etiĝis. Je mia malfeliĉo, mi parolis pri ili al don Fernando, dum mi pensis, ke pro lia granda amikeco al mi, mi devas kaŝi nenion antaŭ li. Mi laŭdis la belon, la gracion kaj la saĝon de Luscinda, tiel, ke miaj laŭdoj vekis en li la deziron vidi la pucelon dotitan per tiel valoraj kvalitoj. Je mia misfortuno, mi cedis al liaj petoj kaj iun nokton, ĉe la lumo de lampo, mi montris ŝin al li tra la fenestro, kie mi kutime parolis kun Luscinda. Li vidis ŝin en bluzo kaj ŝia belo tiel lin frapis, ke li forgesis la ceterajn ĉarmulinojn, kiujn li vidis ĝis tiam. Li mutiĝis, perdis la konscion, restis en ekstazo kaj fine profunde enamiĝis, kiel baldaŭ montros al vi la rakontado de mia misfortuno.

»La hazardo, por pli eksciti lian deziron (kiun li kaŝis antaŭ mi, kaj kiun nur en soleco konfidis al la ĉielo), metis inter liajn manojn bileton de Luscinda dirantan, ke mi petu de ŝia patro permeson por nia geedziĝo. La bileto ŝajnis al don Fernando tiel saĝa, diskreta kaj amo-plena, ke, leginte ĝin, li diris al mi, ke sole en Luscinda troviĝas kune ĉiuj ĉarmoĵoj de la beleco kaj de la saĝo, renkonteblaj nur porcie en la ceteraj virinoj de la mondo. Tamen mi devas konfesi nun, ke al mi ne plaĉis vidi, ke la laŭdoj al Luscinda, kvankam ĝustaj, venas de la buŝo de don Fernando. Mi eksentis timon kaj ĵaluzon, ĉar li ĉiam volis paroli pri Luscinda, eĉ prenante je la haroj la okazon por tio. Tia insistado vekis en mi ian senton de ĵaluzo, ĉar, kvankam mi ne atendis devion de la virto kaj de la fideleco de Luscinda, tamen mi timis, ke la Fato povus meti en danĝeron ĝuste kion Ĝi ŝajne plej certigis. Don Fernando ĉiam provis legi la biletojn, kiujn mi sendis al Luscinda, kaj ŝiajn respondojn, sub la preteksto, ke al li tre plaĉas nia saĝo. Okazis tiam, ke Luscinda petis de mi por relego kavaliran libron tre ŝatatan de ŝi kaj titolitan *Amadis de Gaŭlio*...

Tuj kiam don Quijote aŭdis la nomon de kavalira libro, li diris:

—Kial via moŝto ne menciis ĉe la komenco de via historio, ke sinjorino Luscinda amas la librojn kavalirajn? Nenio kroma nek superlaŭda necesas por konvinki min pri la grandeco de ŝia saĝo, kaj sendube ŝi ne havas la talenton, kiun vi diris, se al ŝi mankus la gusto al tiel delica legado. Tiel do, oni ne bezonas pli da vortoj por pentri al mi ŝian belon, saĝon kaj indon, ĉar ĉe la nura mencio de ŝia inklino, mi deklaras ŝin la plej bela kaj saĝa virino de la mondo. Mi dezirus, sinjoro, ke krom *Amadís de Gaŭlio*, vi estus sendinta al ŝi la bravan *Don Rugel de Grekujo*, ĉar mi scias, ke al sinjorino Luscinda tre plaĉas Daraida kaj Garaya, la saĝaj rezonoj de la paŝtisto Darinel kaj ties mirindaj bukolikoj kantataj kaj reprezentataj

de li mem kun plena gracio, sprito kaj senĝeno. Sed venos la tempo ripari tian mankon, tiel baldaŭ kiel vi bonvolos akompani min al mia vilaĝo, ĉar tie mi montros al vi pli ol tricent librojn, kiuj estas la delico de mia koro kaj la distro de mia vivo. Kvankam mi pensas nun, ke mi havas neniun, kaŭze de la malico de perversaj kaj envidemaj sorĉistoj. Kaj via moŝto pardonu, ke mi ne observis la promeson ne interrompi vian rakonton, ĉar, kiam mi aŭdas ion pri kavaliraĵoj aŭ vagantaj kavaliroj, al mi estas tiel neeble silenti, kiel neblas al la radioj sunaj ne varmigi, aŭ al la lunaj ne humidigi.^[114] Do, denove pardonon. Kaj daŭrigu, ĉar tio estas nun pli grava.

Dum ĉion ĉi parolis don Quijote, Cardenio ŝajne en profunda medito tenis la kapon klinita super la brusto, kaj kvankam nia hidalgo dufoje petis lin daŭrigi la rakonton, Cardenio nek levis la kapon nek respondis eĉ unu vorton. Sed kelkan tempon poste li suprenrigardis kaj diris:

—Mi havas la firman konvinkon, kaj neniun homo en la mondo povus dekonvinki min, kaj li estus idioto se li pensus la malon, ke la granda fripono majstro Elisabat konkubis kun reĝino Madásima.

—Ho, ne, tute ne, je Dio! —respondis don Quijote kun granda kolero, ĵurante, kiel li kutimis—. Kiel malica, pli ĝuste, kiel fia kalumnio! Reĝino Madásima estis tre nobela sinjorino, kaj oni ne devas supozi, ke tiel granda princino povis konkubi kun ajna herni-tranĉisto.^[115] Kaj se iu asertas la malon, li mensogas kiel kanajlo, kaj mi tion pruvos piede aŭ rajde, kun armoj aŭ sen ili, tage aŭ nokte, aŭ kiel ajn oni volos.

Cardenio nur rigardadis lin tre atente, pro tio, ke la junulon trafis nova atako de frenezo, kaj lia stato ne permesis lin daŭrigi la rakonton. Krome don Quijote ne plu aŭskultus, eĉ

se Cardenio parolus ankoraŭ, ĉar li profunde ĉagreniĝis kaŭze de tio, kion li aŭdis pri Madásima.

Stranga afero! Li defendis ŝin ardege, kvazaŭ ŝi estus lia vera kaj propra sinjorino: tiel grandan povon havis super li liaj demonaj libroj. Mi diras do, ke sub la influo de la krizo de frenezo, Cardenio, aŭdante ke oni nomas lin mensogulo, kanajlo kaj aliaj similaj fivortoj, juĝis tion tre peza ŝerco, prenis ŝtonon proksiman kaj donis per ĝi tian baton sur la bruston de don Quijote, ke tiu falis dorsen. Kiam Sancho Panza vidis, ke oni mistraktas lian sinjoron, li sin ĵetis kun fermitaj pugnoj kontraŭ la frenezulo, sed la ĉifona kavaliro akceptis lin tiamaniere, ke per unu pugnobato sternis la ŝildiston ĉe siaj piedoj, saltis sur lin kaj ĝislace tretis al li la ripojn.

La kapristo volis lin defendi kaj suferis la saman sorton, kaj Cardenio, lasinte ilin tradraŝitaj kaj muelitaj, iris per trankvilaj paŝoj rifuĝi en la monton. Leviĝis Sancho kaj, furioza pro la nemeritita batado, kuris venĝi sin kontraŭ la kapristo, dirante, ke li kulpas, ĉar li ne avertis siatempe, ke Cardenio suferas periodan frenezon, kaj ke, se ili tion sciis, ili povintus sin prepari por defendi sin. La kapristo respondis, ke li jam informis pri la frenezo de la junulo, kaj ke li do ne kulpas, se la ŝildisto preteratentis la sciigon. Replikis Sancho Panza kaj same la kapristo kaj la disputo finiĝis per tio, ke ĉiu el ili kaptis la barbon de la alia, kaj ili tiel batis sin reciproke, ke ili ne turniĝis en pulpon dank' al la interveno de don Quijote. Sancho, alkroĉita ankoraŭ al la kapristo, diris:

—Lasu min, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno. Li estas kampulo kiel mi, ne armita kavaliro, do mi povas senplie venĝi al li pro lia ofendo, luktante kontraŭ li sen ia avantaĝo ĉe mia flanko, kiel viro de honoro.

—Vi pravas —diris don Quijote—. Sed mi scias, ke pri tio okazinta li ne kulpas.

Tiel li trankviligis ilin kaj denove demandis la kapriston, ĉu eblas renkonti Cardenion, ĉar li ege deziras scii la finon de la historio. La kapristo respondis kion jam dekomence diris, ke oni ne precize konas, kie Cardenio sin kaŝas, kaj ke, se don Quijote vagados tra la montoj, li certe trovos lin, freneza aŭ malfreneza.

[114] En la tempo de Cervantes oni kredis, ke la luno, opone al la suno, estas humida planedo, kaj ke de ĝi fontas kaj venas la humido.

[115] Laŭ la romanoj kavaliraj, majstro Elisabat estis, interalie, eminenta ĥirurgo. Disdegne kaj insulte don Quijote dediĉas al li tiun amuzan epiteton.

Ĉapitro 25

Kiu traktas pri la strangaĵoj okazintaj en Sierra Morena al la kuraĝa kavaliro de La Mancha, kaj pri lia imito de la pentofaro de Beltenebros

Don Quijote diris adiaŭon al la kapristo, saltis denove sur la ĉevalon, ordonis la ŝildiston sekvi lin, kion Sancho sur la azeno^[116] faris tre kontraŭvole, kaj iom post iom ili penetris en la pli aspran parton de la monto. Sancho ege deziris babilu kun sia mastro, sed, ne volante rompi lian ordonon, li atendis, ke don Quijote parolu unua. Fine, li ne povis suferi tian silenton kaj diris:

—Sinjoro don Quijote, via moŝto donu al mi vian benon kaj vian forpermeson, ĉar de ĉi tie mi volas reveni al mi kaj loĝi kun mia edzino kaj miaj filoj. Almenaŭ mi povos paroli kun ili laŭplaĉe. Pretendi, ke mi sekvu vian moŝton tage kaj nokte tra ĉi solejoj sen paroli, kiam paroli mi deziras, estas kvazaŭ enterigi min viva. Se almenaŭ la bestoj parolus, kiel ili parolis en la tempoj de Guisopete,^[117] la afero irus ne tiel mave pro tio, ke mi babilus kun mia azeno laŭvole kaj tiel forgesus mian aĉan sorton: ĉar estas tre dure kaj ekster la limoj de la pacienco serĉi aventurojn dum la tuta vivo kaj trovi nur kalcitrojn kaj bernadojn, ŝtonojn kaj pugnobatojn kaj krome teni la buŝon fermita, sen kuraĝi diri kion oni havas en la koro, kvazaŭ oni estus muta.

—Mi komprenas, Sancho —respondis don Quijote—. Vi pereas de la deziro, ke mi liberigu vin de la prohibo, kiun mi trudis al via lango. Nu, konsentite: parolu kion ajn vi volas, sed sub la kondiĉo, ke mia permeso validas nur, dum ni vagas tra ĉi montoj.

—Tre bone —diris Sancho—. Mi parolu nun; poste Dio scias kio okazos. Kaj por komenci jam profiti vian permeson, mi dezirus demandi, kial vi defendis tiel arde reĝinon Magimasa, aŭ kio ajn ŝi nomiĝas? Krome, ĉu gravas tio, ĉu la abato^[118] estis, aŭ ne estis, ŝia amiko? Se vi estus ignorinta tion, ĉar vi ne estas ŝia juĝisto, mi kredas, ke la frenezulo daŭrigus sian rakonton, sen ke ni ricevus la ŝtonbaton, la kalcitrojn kaj eĉ pli ol ses survangojn.

—Vere, Sancho —respondis don Quijote—, se vi scius, kiel mi scias, kiel honesta kaj nobela sinjorino estis reĝino Madásima, certe vi dirus, ke mi havis tro da pacienco, pro tio, ke mi ne rompis la buŝon, el kie eliris tiaj blasfemoj; ĉar egalas grandan blasfemon pensi kaj diri, ke reĝino konkubis kun ĥirurgo. Laŭ la vero de ilia historio, majstro Elisabat, menciita de la frenezulo, estis homo tre saĝa kaj konsilanto tre bona, kaj servis kiel kuratoro kaj kuracisto al la reĝino. Sed pensi, ke ŝi konkubis kun li, estas ekstravaganco meritanta la plej severan punon. Cetere Cardenio ne konsciis kion li diris, kaj sendube vi memoras, ke en tiu momento lia cerbo iris jam promeni.

—Ĝuste tial mi ne komprenas, ke vi prenis serioze la vortojn de frenezulo —diris Sancho—. Kaj konsideru, ke la sorto gvidis la ŝtonon, ne kontraŭ la kapon, sed kontraŭ la bruston de via moŝto, kaj dank' al tio ni vidas nin, ne en plej lamentinda stato pro la insisto defendi la sinjorinon reĝinon, Dio ŝin damnu! Krome, Cardenio, ĉar freneza, ricevus absolvon de la justico.

—La devo de la vagantaj kavaliroj estas protekti, kontraŭ frenezaj aŭ prudentaj, la honoron de la virinoj de ajna rango, des pli, kiam temas pri reĝinoj tiel precipaj kaj virtaj kiel Madásima, al kiu mi sentas specialan simpatian pro ŝiaj bonaj kvalitoj. Ŝi estis, ne nur bela, sed tre prudenta, kaj krome tre pacienca en siaj multaj misfortunoj. La konsiloj kaj

la akompano de majstro Elisabat estis al ŝi tre utilaj kaj helpaj, kaj tial ŝi eltenis kun pacienco kaj prudento la batojn de la sorto. Tio donis okazon al la malica kaj senscia popolaĉo diri kaj pensi, ke ŝi konkubis kun li. Kaj mi asertas denove, kaj asertos ducent fojojn pliajn, ke, kiuj tiel pensas aŭ diras, mensogas kaj mensogos.

—Mi, nek pensas, nek diras ion —respondis Sancho—. Kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu. Se ili konkubis, aŭ ne, ili jam prezentis al Dio la konton de siaj agoj. Mi hejme sidis, nenion vidis. Al mi ne plaĉas scivoli pri alies vivoj, vortoj sakon ne plenigas. Des pli, ke nuda mi naskiĝis, kaj nuda mi troviĝas, do sen perdo kaj gajno. Kio tuŝas min, se ili konkubis? Multaj pensas, ke ekzistas ŝinkoj tie, kie oni ne trovas eĉ hokon por viando. Sed, kiu povus haltigi la disflugon de la vento? Eĉ la propran Dion trafas kritikoj...

—Sankta ĉielo! —ekkriis don Quijote—. Kia rozario da stultaĵoj, Sancho! Kia rilato ekzistas inter tio, kion ni traktas kaj via ŝutado de proverboj? Je via vivo, Sancho, silentiĝu, kaj de nun zorgu nur sproni la azenon kaj ne miksi vin en aferojn, kiuj ne koncernas vin. Kaj per viaj kvin sensoj ensorbu, ke miaj faroj pasintaj, nunaj kaj futuraj konformas al la racio kaj al la kavalirismo, kies regularon mi konas pli bone ol ĉiuj kavaliroj al ĝi submetitaj en la mondo.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Ĉu estas bona regulo de la kavalirismo vagadi kaprice tra ĉi montoj sen vojoj kaj padoj, serĉante frenezulon, kiu, se trovita, eble deziros fini, ne la komencitan rakonton, sed la komencitan taskon rompi la kapon al via moŝto kaj la ripojn al mi ĝis la lasta ostoj?

—Silentiĝu, Sancho, mi petas vin ankoraŭfoje. Sciu, ke ne nur la deziro trovi la frenezulon retenas min ĉi-loke, sed ankaŭ la intenco plenumi heroaĵon por la akiro de eterna renomo kaj gloro en la tuta konata mondo; tian heroaĵon, ke

per ĝi mi konkeros la plejan perfektecon kaj famon atingeblan de vaganta kavaliro.

—Kaj tia faro estos tre danĝera? —demandis Sancho Panza.

—Ne —respondis la Kavaliro de la Trista Mieno—, kvankam la kubo povus tiel fali, ke ĝi igus nin perdi, anstataŭ gajni. Tamen, ĉio dependos de via diligento.

—De mia diligento?

—Jes —diris don Quijote—, ĉar, se vi revenos baldaŭ de la loko, kien mi pensas vin sendi, baldaŭ finiĝos mia aflikto, kaj baldaŭ komenciĝos mia gloro. Sed ne ĝustas, ke vi estu en suspenso, atendante la signifon de miaj vortoj, do, sciu jam, Sancho, ke Amadís de Gaŭlio eminentis kiel unu el la plej perfektaj kavaliroj vagantaj; nu, mi eraris, dirante «unu»; fakte li estis la unika, la unua, la supera inter la kavaliroj de sia epoko. Hontu don Belianís kaj la homoj asertantaj kun li, ke li egalas en kelkaj rilatoj al Amadís. Mi ĵuras, ke ili trompiĝas, kaj mi diras ankaŭ, ke, kiam pentristo deziras eminenti en sia arto, li klopodas imiti la originalojn de la grandaj majstroj, kaj la sama regulo aplikiĝas al la profesioj kaj metioj, kies produktoj garnas kaj ornamas la naciojn. En la sama maniero, aspiranto al reputacio de homo prudenta kaj pacienca devas imiti, kaj imitas, Ulison, per kies persono kaj laboroj Homero pentris al ni vivan portreton de prudento kaj pacienco, same kiel Vergilio montris per la persono de Eneo la kuraĝon de kompatema filo kaj la sagacon de brava kaj lerta kapitano. Tamen la poetoj ne pentris ilin, kiaj ili estis, sed kiaj ili devus esti, por ke ili pro siaj virtoj servu kiel ekzemploj al la homoj de la futuro. Tiel same Amadís estis la nordo, la matena stelo, la suno de la kuraĝaj kaj enamiĝintaj kavaliroj, kaj ni ĉiuj, militantaj sub la flagoj de la amo kaj de la kavalirismo, devas lin imiti. Sekve, Sancho amiko, mi konkludas, ke la vagantaj kavaliroj, kiuj plej bone lin imitas,

plej proksimas al la perfekteco de la kavalirismo. Amadís montris sin elstara en prudento, kuraĝo, pacienco, virto, firmeco kaj amo, kiam, disdegnata de sinjorino Oriana, li sin retiris al la Nuda Roko por tie pentofari sub la nomo de Beltenebros, nomo tre signifa kaj konforma al la vivo, kiun li volonte elektis. Nu, estas al mi pli facile imiti lin ĉe tio, ol ĉe la alio: trahaki gigantojn, senkapigi serpentojn, mortigi drakojn, dispeli armeojn, frakasi eskadrojn kaj rompi ensorĉojn. Kaj konsiderante, ke ĉi loko tre konvenas por pentofaro, mi ne lasos preteriri la okazon, kiu tiel oportune sin proponas al mi.

—Finfine, sinjoro, kion volas fari via moŝto en ĉi loko tiel izola? —demandis Sancho.

—Ĉu mi ne diris jam —respondis don Quijote—, ke mi pensas imiti Amadís kaj krome konduti despere, freneze kaj furioze, kiel la kuraĝa don Rolando, kiam li trovis ĉe fonto pruvon, ke la bela Angélica senhorigis sin kun Medoro? Ĉe tio don Rolando freneziĝis de doloro, elŝiris arbojn, makulis la akvon de la klaraj fontoj, trenis ĉevalojn kaj faris cent mil ekstravagancojn indajn je eterna famo kaj memoro. Tamen mi intencas, ne imiti ĉiun frenezaĵon, kiun pensis, diris aŭ faris Rolando, Orlando aŭ Rotolando (ĉi tri nomojn li havis) sed nur supraĵe kaj skize sekvi lian ekzemplon. Kaj povas esti, ke fine mi kontentiĝos imitante nur Amadís, ĉar li atingis senegalan famon, frenezumante ne per violentaj agoj, sed per ploroj kaj afliktoj.

—Ŝajnas al mi —diris Sancho—, ke la kavaliroj plenumintaj tiajn stultaĵojn kaj pentofarojn sentis sin puŝitaj de ia motivo. Sed, kian kaŭzon havas via moŝto por turni vin freneza? Ĉu ajna damo vin disdegnis? Ĉu vi trovis ian pruvon, ke sinjorino Dulcinea de El Toboso petolis nedece kun arabo aŭ kristano?

—En tio kuŝas la esenco kaj la subtilo de mia plano — respondis don Quijote—. Kavaliro farus nenion meritan nek dankindan, se li freneziĝus pro ia motivo. Valoras ja ekstravaganci senkaŭze, por ke mia damo pensu, kion mi farus pikite, se konsideri kion mi faras nepikite. Krome sufiĉan motivon mi havas: la longan foreston disde Dulcinea de El Toboso, la ĉiama sinjorino mia. Vi jam aŭdis la paŝtiston Ambrosio diri, ke, kiu forestas, imagas kaj timas ĉian mavon. Tiel do, amiko Sancho, ne perdu vian tempon konsilante min rezigni tiel raran, feliĉan kaj senprecedencan imiton. Mi estas freneza, kaj freneza mi estos, ĝis vi revenos kun la respondo al letero, kiun mi pensas sendi al mia sinjorino Dulcinea. Se ŝia respondo montriĝos tia, kian mia fideleco meritas, finiĝos en la sama momento miaj frenezo kaj pentofaro. Sed se ŝia respondo ne estos favora, tiam mi efektive freneziĝos kaj sentos nenion. Do, kion ajn ŝi respondos, mi vidos min libera de la konflikto kaj de la aflikto, en kiuj vi min lasos, ĉar se vi alportos al mi bonan novaĵon, mi ĝin ĝuos en mia sana menso, kaj se mavan, mi ne sentos ĝin en mia frenezo. Sed diru, Sancho, ĉu vi bone konservas la kaskon de Mambrino? Mi vidis vin preni ĝin de la grundo, post ol tiu sendankulo volis frakasi ĝin en pecojn. Tamen, li ne sukcesis, kio pruvas ĝian bonan harditecon.

—Je la nomo de Dio, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno! — respondis Sancho—. Mi apenaŭ povas toleri kaj suferi pacience kelkajn dirojn de via moŝto. Ili igas min pensi, ke ĉio, kion vi mencias pri kavaliraĵoj, konkeroj de regnoj kaj imperioj, donacoj de insuloj, favoroj kaj rekompencoj kaj similaj aferoj kutimaj inter la vagantaj kavaliroj, estas nur vento kaj mensogo, frikcio aŭ fikcio, aŭ kio ajn ĝi nomiĝas, ĉar, se iu aŭdus vin diri, tra pli ol kvar tagoj la saman eraron, ke barbo-pelvo estas la kasko de Mambrino, ĉu li ne opinius, ke al la homo tion pensanta kaj asertanta mankas klapo en la kapo? La pelvon plenan de tuberoj mi kunportas en la dusako kaj intencas preni ĝin hejmen por ĝin ripari kaj uzi

en la prizorgo al mia barbo, se Dio bonvolos, ke mi denove vivu iam kun miaj edzino kaj filoj.

—Aŭskultu, Sancho —diris don Quijote—. Mi ĵuras je la sama nomo, per kiu vi ĵuris antaŭe, ke inter la ŝildistoj de la tuta mondo nunaj kaj pasintaj, vi havas la plej etan cerbon. Kio! Ĉu eble vi ne rimarkis ankoraŭ, de kiam vi akompanas min, ke ĉio rilate al la vagantaj kavaliroj ŝajnas esti ĥimeroj, absurdoj kaj ekstravagancoj kaj iri kontraŭdirekte? Okazas tiel, ĉar ĉiam troviĝas inter ni bandaĉo de sorĉistoj, kiuj ŝanĝas, transformas kaj modifas laŭplaĉe niajn aferojn, ĉu por favori, ĉu por detrui ilin. Sekve, kio al vi ŝajnas pelvo, al mi ŝajnas la kasko de Mambrino, kaj al alia persono eble ŝajnas io diferenca. La sorĉisto min protektanta rivelis raran antaŭvidon, igante, ke la vera kaj efektiva kasko de Mambrino ŝajnu pelvo al la ceteraj homoj; alie la tuta mondo min persekutus por forpreni ĝin de mi, kaŭze de ĝia granda valoro; sed, vidante, ke ĝi aspektas kiel nura pelvo, oni ĝin ignoras, kiel evidentiĝis, kiam tiu ulo volis ĝin rompi kaj lasis ĝin sur la grundo, kion certe li tute ne farus, se li sciis, ke temas pri la fama kasko. Gardu ĝin, amiko, nun mi ne bezonas ĝin, des malpli, ke mi devos demeti la armaĵon kaj resti tute nuda, kvazaŭ ĵus naskita, se mi fine inklinos pentofari, imitante pli la ekzemplon de Amadís ol la agojn de Rolando.

Tiel parolante ili alvenis al la piedo de alta rokego izole staranta inter aliaj multaj en la ĉirkaŭo. Apude fluis lantakva rojo tra herbejo tiel verda kaj densa, ke ĝi ĉarmis al la okuloj. Vidiĝis ankaŭ multaj sovaĝaj arboj kaj kelkaj arbustoj kaj floroj, kiuj igis la lokon pli agrabla. La Kavaliro de la Trista Mieno decidis resti tie por plenumi sian pentofaron kaj, admirante la lokon, diris laŭte, kvazaŭ delire:

—Jen la loko de mi elektita, kie mi priploros la misfortunon, kiun vi, ho ĉielo, trudis al mi. Ĉi tie la larmoj de miaj okuloj

Ŝveligos la akvon de la roĵo, kaj mia senhalta kaj profunda suspirado konstante movos la foliojn de ĉi sovaĝaj arboj, kiel signo kaj atesto de la aflikto torturanta mian povran koron. Ho vi, kiuj ajn vi estas, kamparaj dioj de ĉi negastama loko: aŭdu la plendojn de senespera amanto, ĉar longa foresto kaj imagaj ĵaluzoj pelis lin lamenti inter aspraj rokoj kaj vei pri la kruela naturo de sendanka ĉarmulino, kulmino kaj apogeo de la homa beleco! Ho vi, nimfoj kaj driadoj kutime loĝantaj en la denso de la arbaroj: la lascivaj kaj rapidaj satirusoj, kiuj vin deziras, kvankam vane, neniam molestu vin en via dolĉa ripozo, por ke vi helpu min lamenti mian misfortunon, aŭ por ke, almenaŭ, vi ne laciĝu min aŭdi! Ho Dulcinea de El Toboso, tago de mia nokto, gloro de mia aflikto, nordo de miaj vojoj, stelo de mia sorto: la ĉielo plenumu ĉiun peton vian, kaj nun vi konsideru, en kian lokon kaj en kian staton via foresto min metis, kaj bonvolu repagi min, kiel mia fideleco meritas! Ho solecaj arboj, jam de nun kompanoj de mia propra soleco: ekmontru per la mola movo de viaj branĉoj, ke mia ĉeesto ne ofendas vin! Ho vi, ŝildisto mia, agrabla kunulo en miaj tagoj de feliĉo kaj ankaŭ de misfortuno, bone enbatu al vi en la memoron ĉion kion mi faros ĉi tie antaŭ vi, por ke vi raportu kaj rakontu ĝin al la ununura kaŭzantino de mia aflikto!

Tiel parolinte li desaltis de Rocinante, en unu momento deprenis de ĝi la selon kaj la bridon, donis al ĝi manfrapon sur la pugon kaj diris:

—Ricevu la liberon, kiu mankas al via mastro, ho ĉevalo tiel glora pro viaj faroj, kiel kompatinda pro via sorto! Iru laŭplaĉe: sur via frunto legiĝas, ke, nek la Hipogrifo de Astolfo, nek la fama Frontino, kiu tiel kare kostis al Bradamante,^[119] povus egali vin en rapido.

—Benata la homo evitanta al mi la laboron senseligi la azenon, ĉar alie certe ankaŭ ĝi ricevus laŭdajn manfrapetojn

kaj vortojn —diris Sancho—. Sed se ĝi troviĝus ĉi tie, mi permesus neniun senseligi ĝin. La stato de enamiĝintoj kaj desperantoj neniel koncernus ĝin, ĉar mi, kiu estis ĝia mastro, kiam Dio volis, suferas nek enamiĝon nek desperon. Kaj vere, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno, se vi parolas serioze pri mia foriro kaj pri via frenezo, konvenas refoje seli la ĉevalon. Mi uzos ĝin manke de la azeno kaj ŝparos tempon en la iro kaj reveno. Se mi irus piede, mi ne scias, kiam mi trafus en la vilaĝon, aŭ kiam mi revenus, ĉar, verdire, mi ne tre eltenas piediri.

—Faru laŭ via plaĉo, Sancho —diris don Quijote—. Via ideo ŝajnas bona, tamen vi ekiros post tri tagoj, ĉar mi volas, ke ĝis tiam vi observu kion pro amo al ŝi mi diros kaj faros. Poste vi povos informi ŝin pri la tuta afero.

—Cu mi devas vidi ion kroman ne jam viditan? —demandis Sancho.

—Vi tute ne scias pri kavaliraĵoj —respondis don Quijote—. Al mi mankas ankoraŭ ŝiri la veston, dismeti la armaĵon, bati la rokojn per la kapo kaj fari aliajn similajn aferojn, kiuj mirigos vin.

—Je la amo de Dio —diris Sancho—. Via moŝto zorgu la kapon, ĉar ĝi povus batiĝi kontraŭ ajna roko tiel kaj tiom, ke per la unua frapo detruigiĝus la maŝino de ĉi pentofaro. Se via moŝto opinias la batojn nepre necesaj por la plenumo de via tasko, mi pensas, ke, tial, ke ĉio ĉi estas ŝajno, afero luda kaj neserioza, vi devus kontentiĝi, frapante la kapon kontraŭ la akvon aŭ kontraŭ ion molan kiel kotono. Mi farus la ceteron, nome, diri al sinjorino Dulcinea, ke via moŝto martelis per la kapo pintan rokon pli duran ol diamanto.

—Mi dankas vin pro via bona intenco —respondis don Quijote.— Sciu, tamen, ke ĉion ĉi mi faras, ne lude, sed tre

serioze, ĉar alie mi rompus la regulojn de la kavalirismo, kiuj punas la diron de mensogoj tiel rigore, kiel oni punas krimon de rekulpiĝinto. Fari ion anstataŭ alio egalas mensogi, do miaj kapobatoj devos esti veraj, fortaj kaj efikaj, sen trompo kaj fantazio. Tial, ke bedaŭrinde ni perdis la balzamon, lasu al mi iom da ĉarpio, ke mi povus kuraci min siatempe.

—Pli bedaŭrinda estas la perdo de la azeno —respondis Sancho—, ĉar kun ĝi perdiĝis la ĉarpio kaj ĉio cetera. Kaj via moŝto bonvolu forgesi la damnitan pocion, ĉar ne nur la stomako, sed eĉ la animo mem vomemas en mi, kiam mi aŭdas la vorton «balzamo». Rilate al la tri tagoj, kiujn vi determinis, por ke mi observu vin frenezumi, bonvolu rigardi ilin jam pasintaj. De mia flanko mi konsideros viajn ekstravagancojn same viditaj kaj pasintaj, kaj mi diros pri ili ĉion mirindan al sinjorino Dulcinea. Do skribu la leteron kaj tuj forsendu min, ĉar mi tre deziras baldaŭ reveni kaj elpreni vin el ĉi purgatorio, kie mi vin lasas.

—Ĉu vi nomas ĝin purgatorio, Sancho? —diris don Quijote—. Pli ĝuste nomu ĝin infero, aŭ io pli mava ankoraŭ, se io tia ekzistas.

—Mi aŭdis diri, ke por la inferuloj *nula es retencio*^[120] —respondis Sancho.

—Mi ne komprenas tion pri «retencio» —diris don Quijote.

—«Retencio» signifas, ke, kiam oni sidas en la infero, oni ne povas eliri el ĝi. Sed tio ne okazos al vi, se nur miaj piedoj taŭgos, ĉar mi spronos la ĉevalon por ĝin reanimi kaj reveni plej baldaŭ. Nu, imagu min en El Toboso antaŭ la sinjorino Dulcinea. Mi diros al ŝi tiajn rakontojn pri la stultaĵoj kaj frenezaĵoj (ili ja estas unu sama afero), kiujn via moŝto faris kaj faras, ke ŝi turniĝos supla kiel ganto, eĉ se mi trovos ŝin pli dura ol kverko. Kun ŝia dolĉa kaj mielflua respondo mi

revenos tra la aero, kiel sorĉisto, kaj elprenos vin el ĉi purgatorio simila al la infero, sed ne vera infero, ĉar ekzistas la espero eliri el ĝi, kio, kiel mi jam diris, ne okazas en la aŭtentika infero. Certe via moŝto pensas same.

—Vi ja pravas —diris la Kavaliro de la Trista Mieno— sed, kiel ni helpas al ni por skribi la leteron?

—La leteron kaj la mandaton pri la azenoj... —aldonis Sancho.

—Ĉio senescepte iros —diris don Quijote— kaj, ĉar mankas papero, konvenus skribi kiel la antikvuloj, sur folioj de arboj aŭ sur vaksotabeloj, kvankam ĉi lastaj estus tiel malfacile troveblaj kiel la papero. Sed mi memoras nun, ne bonan sed bonegan lokon por skribi, nome, la kajeron de Cardenio. Vi zorgos, ke oni kopiu poste la leteron sur la konvena papero kaj per bona kaligrafio en la unua vilaĝo kun lerneja instruisto; manke de tiu, ajna sakristiano faros la transkribon, sed nenial komisiu la kopiadon al advokata aktisto, ĉar ili uzas tiel fuŝan manskribon, ke eĉ la diablo mem ne komprenus la leteron.

—Kion pri la signaturo? —demandis Sancho.

—Amadís neniam metis signaturon al siaj leteroj —respondis don Quijote.

—Tre bone —diris Sancho—. Sed la mandato devas porti ĝin, kaj, se kopiita, ĝi vidiĝos falsa, kaj mi ne ricevos la azenojn.

—La mandaton mi skribos kaj signaturos en la kajero mem, kaj mia nevino, vidante ĝin, plenumos la ordonon senproteste. Rilate al la letero ama, vi postulos, ke oni skribu, kiel signaturon: «ĝismorte via, la Kavaliro de la Trista Mieno». Kaj ne gravas, ke fremda mano tion faros, ĉar, kiom mi memoras, Dulcinea scias nek legi nek skribi, kaj neniam

en sia vivo ŝi vidis leteron aŭ skribon mian. Nia amo estis ĉiam platona kaj limiĝis nur al interŝanĝo de honestaj rigardoj, kaj eĉ tion ni faris tiel malofte, ke mi povas laŭvere ĵuri, ke kvankam jam de dek du jaroj mi amas ŝin pli ol la lumon de miaj propraj okuloj, mi vidis ŝin apenaŭ kvar fojojn, kaj tre eble eĉ ne unufoje ŝi rimarkis, ke mi ŝin rigardas: en tia enfermiteco kaj deco edukis ŝin ŝiaj gepatroj Lorenzo Corchuelo kaj Aldonza Nogales.

—Kio! —diris Sancho—. Ĉu la filino de Lorenzo Corchuelo estas la sinjorino Dulcinea de El Toboso, alinome Aldonza Lorenzo?

—Ŝi mem en persono —respondis don Quijote—. Kaj ŝi meritas troni super la tuta universo.

—Mi konas ŝin tre bone —diris Sancho— kaj povas informi vin, ke ŝi kapablas alĵeti feran stangon tiel disten kiel la plej forta junulo de la vilaĝo. Je Dio! Ŝi estas vere fortika, brava, kun medolo en la ostoj de la kapo ĝis la piedoj, kaj povus facile eltiri el ajna situacio la kavaliron, vagantan aŭ sidantan, kies damo ŝi estus. Ha, la putinido! Kian forton ŝi havas! Kaj kian voĉegon! Mi memoras, ke foje ŝi surpriris la kampanilon de la vilaĝo por voki de tie kelke da junaj paŝtistoj de sia patro, troviĝantaj en novalo lia preskaŭ du mejlojn for, kaj ili aŭdis ŝin tiel klare, kvazaŭ ili starus ĉe la piedo mem de la turo. La plej bona afero ŝia estas, ke ŝi kondutas tute senceremonie kaj senĝene, laŭ la maniero de kortega damo: kun ĉiu ŝi petolas, kaj pri ĉio ŝercas kaj blagas. Nun mi diras, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno, ke vi povas kaj devas, ne nur frenezumi pro ŝia persono, sed desperi kaj eĉ pendumi vin. La tuta mondo dirus, ke vi faris bone, eĉ se la diablo vin prenis. Mi volus iri jam survoje, ĉar mi deziras okuli ŝin denove; jam de longe mi ne vidas ŝin, kaj certe ŝi tre ŝanĝiĝis, pro tio, ke la vento, la suno kaj la kamparo tre difektas la vizaĝon de la virinoj. Sed mi devas

konfesi al via moŝto, sinjoro don Quijote, ke ĝis nun mi vivis en granda nescio; mi vere kaj efektive pensis, ke sinjorino Dulcinea estas ia princino, aŭ almenaŭ altranga damo meritanta la valorajn donacojn, kiujn vi sendis: la vaskon, la galerulojn, kaj ĉion alian sendube konkeritan de via moŝto en la tempo, kiam mi ne estis ankoraŭ via ŝildisto. Sed, se mi bone pripensas la aferon, ĉu povas interesi al sinjorino Aldonza Lorenzo, nu, al sinjorino Dulcinea de El Toboso, ke la venkitoj ĝis nun senditaj de vi, kaj la ankoraŭ sendotaj, iru genufleksi antaŭ ŝi? Krome povus okazi, ke ĉe ilia alveno, ŝi kombus linon aŭ draŝus tritikon, kaj ili konfuziĝus vidante ŝin, kaj ŝi ridus kaj ne aprezus la donacon.

—Mi jam diris al vi multfoje, Sancho —respondis don Quijote —, ke vi tro babilaĉas, kaj ke, kvankam vi havas etan inteligenton, vi ofte scias sarkasmi. Sed, por ke vi vidu, kiom vi stultas kaj kiom mi diskretas, mi volas, ke vi aŭdu la jenan rakonton: «Foje vidvino bela, juna, riĉa, sendependa kaj ĉefe libermora, enamiĝis al laika frato juna, fortika kaj korpulenta. Lia superulo sciiĝis pri la afero kaj iun tagon diris al la vidvino kun patrece riproĉa tono: “Sinjorino, mi miras, kaj ne sen prava motivo, ke virino precipa, bela kaj riĉa, kia estas via moŝto, enamiĝis al viro vulgaraĉa, mizera kaj idiota, kvankam en ĉi urbo, kie ekzistas tiom da studentoj, doktoroj kaj magistroj pri teologio, vi povus laŭplaĉe elekti inter ili, kiel inter piroj, kaj diri: ‘Jen, mi volas tiun; jen, la alian mi ne volas’”. Sed ŝi respondis kun granda sprito kaj senĝeno: “Via moŝto tre trompiĝas, sinjoro, kaj pensas laŭ elmodiĝintaj ideoj, se vi opinias, ke mi eraris, elektante tian ulon. Kvankam li ŝajnas idioto, la filozofio, kiun mi volas de li, egalas, kaj eĉ superas, la filozofion de Aristotelo mem”». Tiel do, Sancho, se konsideri kion mi volas de Dulcinea, ŝi valoras kiel la plej altranga princino de la tero. Ne ĉiu poeto, kiu kantas laŭdon al sia damo, doninte al ŝi fantazian nomon, efektive havas ŝin kiel amantinon. Ĉu vi pensas, ke Amarilis, Filis, Silvia, Diana, Galatea, Filida kaj multaj similaj,

ĝisplene abundaj en la libroj, romancoj, barbirejoj kaj teatroj konsistis vere el karno kaj ostoj, kaj sin donis al siaj laŭdantoj? Tute ne; plej ofte temas pri fikciaj virinoj, kaj per ili la poeto provizis temon al siaj poemoj, akiris al si reputacion de amanto aŭ paradiso kiel viro kapabla implikiĝi en raran am-aferon. Do, al mi sufiĉas imagi kaj kredi, ke la brava Aldonza Lorenzo sin distingis kiel bela kaj virta. Rilate al ŝia geneologio, la afero apenaŭ gravas, ĉar neniu ĝenos sin enketi pri ĝi, por ke oni akceptu ŝin en ajnan religian ordenon,^[121] kaj de mia flanko mi konsideras ŝin la plej granda princino de la mondo. Ĉar vi devas scii, Sancho, se tion vi ne scias ankoraŭ, ke ĉefe du aferoj instigas nin al la amo: la belo kaj la bona reputacio, kaj per ambaŭ distingiĝas en senmezura grado Dulcinea. Rilate la belon, ŝi ne havas rivalon, kaj rilate la reputacion, malmultaj virinoj ŝin egalas. Resume, mi imagas vera kion mi proklamas, kaj en mia fantazio mi pentras ŝin, kia mi deziras ŝin en belo kaj rango. Helena ne egalas al ŝi, nek Lukrecia, nek la ceteraj famaj virinoj grekaj, barbaraj aŭ latinaj de la pasintaj tempoj. Oni povas opinii laŭvole pri mia vidpunkto, kaj kvankam la sensciaj riproĉus min pro ĝi, la saĝaj certe ne farus al mi grandan kritikon.

—Sendube vi pravas en ĉio, sinjoro —respondis Sancho—, kaj mi estas azeno. Sed mi ne komprenas, kial la vorto azeno eskapas el mia buŝo, ĉar oni ne devas mencii la ŝnuron ĉe pendumito. Donu al mi la leteron, kaj ĝis la revido. Mi jam volas ekiri.

Don Quijote elprenis la kajeron, apartiĝis iom, komencis tre flegme skribi la leteron kaj, fininte ĝin, vokis la ŝildiston kaj diris, ke li volas legi ĝin al li, por ke li ĝin enmemorigu, ĉar la letero povus perdiĝi survoje, se konsideri lian aĉan sorton.

—Via moŝto skribu la leteron du tri fojojn en la kajero, donu ĝin al mi, kaj mi ĝin portos kun granda zorgo, tial, ke estus

tute absurde pensi, ke mi kapablas parkeri ion. Mi havas tiel mavan memoron, ke mi ofte forgesas eĉ mian propran nomon. Tamen, legu ĝin al mi, kaj mi aŭskultos vin kun plaĉo, ĉar certe ĝi estas tiel perfekta, kiel presita peco.

—Aŭskultu do —diris don Quijote.

Letero de don Quijote al Dulcinea de El Toboso

Suverena kaj sublimesinjorino: La vundito de la sago de la foresto, la persono, kies koro rompiĝis ĝis la lasta fibro, deziras al vi ho dolĉega Dulcinea de El Toboso, la sanon al li mankantan. Se via belo min ignoras, se via sento ne sin turnas al mi, se via disdegno faras pli peza ankoraŭ mian aflikton, mi, kvankam hardita suferi, ne povos plu elteni ĉi angoron, kiu estas, ne nur severa, sed longe daŭra. Mia bona ŝildisto Sancho detale informos vin, ho sendanka belulino, amata malamikino mia, kiel mi statas pro via persono. Se vi bonvolos savi min, mi estos via; se ne, faru laŭplaĉe, kaj mi, metante finon al mia vivo, kontentigos vian kruelon kaj mian aflikton.

Ĝismorte via,

La Kavaliro de la Trista Mieno.

—Je la vivo de mia patro! —diris Sancho, aŭskultinte la leteron—. Neniam mi aŭdis ion tiel bonan. Kiel mirinde via moŝto diras al ŝi ĉion, kion vi deziras, kaj kiel bele sonas la signaturo: «La Kavaliro de la Trista Mieno». Verdire via moŝto ŝajnas la diablo mem. Ĉion vi scias.

—Ĉion oni devas scii en mia profesio —respondis don Quijote.

—Nu, bone —diris Sancho—, via moŝto skribu nun sur la alia paĝo la mandaton pri la tri azenoj kaj signaturu ĝin tre

zorge, por ke oni konu vian kaligrafion, kiam oni ĝin vidos.

—Volonte —respondis don Quijote. Kaj skribinte la dokumenton, li legis laŭte:

Ĉe la vido de ĉi azen-mandato, bonvolu via moŝto, sinjorino nevino, transdoni al mia ŝildisto Sancho Panza tri el la kvin azenoj, kiujn mi lasis sub via zorgo en la domo. Mi ordonas: liveri la tri diritajn azenojn page por aliaj tri kontante ricevitaĵoj de mi ĉi tie, kaj kvitanci ilin. Dato: la dudekduan de aŭgusto de la kuranta jaro, en la koro de Sierra Morena.

—Tre bone, bonvolu subskribi, sinjoro —diris Sancho.

—Superfluas la subskribo —respondis don Quijote—. Sufiĉas nur mia parafo, por ke vi ricevu, ne tri azenojn, sed eĉ tricent, se necese.

—Mi vin konfidas —respondis Sancho—. Kaj nun, permesu min seli la ĉevalon, kaj pretiĝu doni al mi vian benon, ĉar mi volas tuj foriri, sen vidi la ekstravagancojn sendube plenumotajn de via moŝto. Tamen mi diros al ŝi, ke mi vidis vin fari tiel multe da ili, ke ŝi ne volos aŭdi plu.

—Mi volas, Sancho, ĉar necesas, ke vi vidu min fari tute nuda almenaŭ unu aŭ du dekojn da frenezaĵoj. Mi ilin plenumos en malpli ol duona horo, kaj, kiam vi ilin vidos per viaj propraj okuloj, vi povos surbaze de ili kaj sen kulpa konscienco aldoni laŭplaĉe al ilia nombro kaj aserti la veron de ĉiuj. Kaj estu certa, ke mi faros pli da frenezaĵoj, ol vi rakontos al ŝi.

—Je la amo de Dio, sinjoro, mi ne volus vidi vin nuda —diris Sancho—. Mi afliktiĝus kaj ne ĉesus plori. La pasintan nokton mi jam priploris tiel forte la azenon, ke la kapo min doloras kaj ne tolerus novajn ploradojn. Tamen, se via moŝto

insistas, ke mi vidu kelkajn el viaj frenezaĵoj, faru ilin kun la vesto sur la korpo, kiel eble plej rapide kaj senprezare. Des pli, ke nenion tian mi bezonas, kaj, kiel dirite, se mi foriras jam, pli frue mi revenos kun la novaĵoj, kiujn via moŝto esperas kaj meritas. Kaj se sinjorino Dulcinea ne respondos kion ŝi devas, ŝi jam preparu sin, ĉar mi solene ĵuras, ke per kalcitroj kaj survangoj mi igos ŝin vomii la konvenan respondon. Kiel honte, se fama kavaliro, kiel vi, freneziĝus sen kaŭzo kaj celo pro ia... Nu, la sinjorino ne donu al mi motivon lasi eskapi la vorton, ĉar se mia lango senbridiĝas kaj mi perdas la kapon kaj la paciencon... oni sin gardu! Ŝi min ne konas, alie ŝi traktus min tre respekte...

—Vere, Sancho —diris don Quijote—, ŝajnas, ke via menso ne funkcias pli bone ol la mia.

—Mi estas, ne tiel freneza kiel vi, sed pli kolera —respondis Sancho—. Cetere, kion vi manĝos dum mia foresto? Ĉu vi imitos Cardenion, rabante de la paŝtistoj?

—Pri tio ne zorgu. Mi manĝos nur la herbojn kaj fruktojn de ĉi loko, eĉ se mi disponos solidan nutraĵon, ĉar la esenco de mia afero konsistas ĝuste en tio: ne manĝi kaj submetiĝi al aliaj rigoroj.

—Ĉu vi volas scii kion mi timas? —diris Sancho—. Ke ĉi loko estas tre kaŝita; kaj mi dubas, ĉu mi povos ĝin trovi.

—Penu bone orienti vin —diris don Quijote—. De mia flanko mi klopodos ne iri for de ĉi tie, kaj eĉ zorgos surpriri la plej altan rokon por vidi, ĉu mi distingos vin, kiam vi revenos. Sed plej konvena afero, por ke vi renkontu min kaj ne perdiĝu, estas, ke vi detranĉu nombron da branĉoj de genisto, tiel abunda ĉi tie, por meti ilin de distanco al distanco, ĝis vi atingos la apertan kamparon. Ili taŭgos al vi

kiel signoj kaj markoj kaj kondutos vin al mi, kiam vi revenos, kiel la fadeno de Teseo en la labirinto.

—Tion mi faros —respondis Sancho.

Li detranĉis kelke da branĉoj, petis sian sinjoron beni lin, kaj ne sen multaj larmoj ili adiaŭis unu la alian. Sancho saltis sur la ĉevalon, don Quijote rekomendis lin zorgi ĝin, kvazaŭ sian propran personon, kaj la ŝildisto ekiris al la aperta kamparo dismetante de distanco al distanco la branĉojn de genisto, kiel lia mastro lin konsilis. Do li ekiris, kvankam don Quijote tede insistis ankoraŭ, ke li devus atendi por vidi lin fari almenaŭ du frenezaĵojn. Fine la ŝildisto, apenaŭ irinte cent paŝojn, revenis kaj diris:

—Mi pensas, ke via moŝto pravas, kaj ke, por ke mi povu aserti sen kulpa konscienco, ke mi vidis vin fari frenezaĵojn, konvenas al mi ĉeesti almenaŭ unu el ili, kvankam mi jam vidis la plej grandan: la restadon de via moŝto ĉi tie.

—Fine vi aŭskultis min —diris don Quijote—. Atendu, Sancho. Mi faros kelkajn frenezaĵojn en malpli da tempo ol necesas por la preĝo de unu Kredo.

Li demetis plej rapide la kuloton, lasis sur si nur la ĉemizon kaj senplie faris du kapriolojn en la aero kaj du transkapiĝojn kun la kapo sube kaj la piedoj alte, rivelante tian parton de sia persono, ke, por ne vidi ĝin la duan fojon, Sancho detiris la bridon de Rocinante kaj foriris kontenta kaj certa pri tio, ke li povas ĵuri, ke lia mastro frenezas. Do ni lasos lin sekvi sian vojon, ĝis lia baldaŭ okazonta reveno.

[116] Cervantes denove forgesas, ke Ginés ŝtelis la azenon disde Sancho.

[117] Sancho volis diri «Isopete», antikva hispana nomo de Ezopo.

[118] Sancho ne memoras la nomon «Elisabat» kaj diras anstataŭe «abato».

[119] Laŭ Ariosto, Bradamante estis militema junulino. Pro ŝia akiro de la ĉevalo Frontino, ŝia amata Rugero restis for de ŝi longan tempon.

[120] La ĝusta esprimo latina estas *in inferno nulla est redemptio*: «ne ekzistas espero eliri el la infero».

[121] En la militaj ordenoj kaj en kelkaj aliaj institucioj oni postulis de la kandidatoj dezirantaj eniri tien, ateston, ke ilia sango puras ekde, almenaŭ, kvar antaŭaj generacioj, tio estas, ke ili havas sangon nek judan nek araban.

Ĉapitro 26

Kie oni plu rakontas pri la eleganta konduto, kiun, pro amo, observis don Quijote en Sierra Morena

Diras la historio, ke post ol la Kavaliro de la Trista Mieno faris kapriolojn kaj transkapiĝojn kun la supra parto de la korpo en ĉemizo kaj la suba senvesta, kaj vidis, ke Sancho foriris ne dezirante spekti pli da sensencaĵoj, li grimpis ĝis la supro de alta roko kaj tie pensis denove kion jam multfoje li antaŭe pensis sen preni decidon, nome, kio estus pli konvena kaj propra al li: ĉu imiti Rolandon en ties frenezo furioza, aŭ Amadison en ties frenezo melankolia. Kaj parolante al si mem, li diris:

—Ne mirige, ke Rolando estis tiel bona kaj brava kavaliro, kiel oni asertas, ĉar finfine, pro lia ensorĉiteco oni povus mortigi lin, nur puŝante longan pinglon en lian plandon, kaj, por eviti tian eventualon, li ĉiam portis ŝuojn kun sep feraj plandumoj. Tamen ili ne efikis kontraŭ Bernardo del Carpio, kiu sciis helpi al si, sufokante lin inter siaj brakoj. Sed ni ignoru la demandon pri lia kuraĝo kaj konsideru nur lian frenezon. Estas vere, ke li freneziĝis, vidinte la indicojn ĉe la fonto kaj aŭskultinte paŝtiston pri tio, ke Angélica siestis pli ol dufoje kun Medoro, juna maŭro krispahara kaj paĝio de Agramonte. Se Rolando kredis, ke lia damo faris al li tiel gravan ofendon, ne surprize do, ke li freneziĝis. Sed, kiel mi povus imiti liajn frenezaĵojn? Mi havas ne similan motivon kaj eĉ ĵuras, ke mia Dulcinea de El Toboso neniam en sia vivo vidis maŭron, eĉ ne en ties tipa vesto, kaj ke ŝi estas tiel kompleta, kiel en la tago kiam ŝia patrino enmondigis ŝin. Do mi grave ŝin ofendus, se, pensante alie pri ŝi, mi freneziĝus laŭ la furioza maniero de Rolando. Krome mi

vidas, ke Amadís de Gaŭlio, sen perdi la prudenton kaj sen fari frenezaĵojn, akiris senegalan reputacion kiel amanto, ĉar, laŭ la historio, kiam Amadís vidis sin disdegnata de sia sinjorino Oriana, kiu ordonis lin ne plu aperi antaŭ ŝi, ĝis ŝi lin denove vokus, li nur retiriĝis al la Nuda Roko en la akompano de ermito kaj tie konsumiĝis, plorante kaj konfidante sin al Dio, ĝis la ĉielo helpis lin meze de liaj plej profundaj aflikto kaj mizero. Nu, se ĉio ĉi estas vera (kaj vera ĝi estas), ĉu valoras, ke mi faru al mi la klopodon tute senvestigi min, makuli la klaran akvon de ĉi rojoj, kie mi trinkos kiam necese, kaj difekti ĉi arbojn, kiuj faris al mi nenian mavon? Oni honoru do la memoron de Amadís, kaj lin imitu kiom eble don Quijote de La Mancha, pri kiu oni diros, kiel oni diris pri la alia, ke, kvankam li ne plenumis grandajn farojn, tamen li mortis entreprenante ilin. Kaj se konsideri, ke mia Dulcinea nek repuŝas, nek disdegnas min, sufiĉas, kiel mi jam diris, priplori la nuran fakton, ke ŝi forestas. Do, ek al la afero! Venu al mia memoro la faroj de Amadís, kaj ili montru al mi, per kio mi devas komenci lin imiti. Mi nun memoras, ke pliparte li preĝis kaj rekomendis sin al Dio. Sed rozario mankas al mi; kiel mi ĝin anstataŭigos?

Tiam venis al li en la kapon la maniero sin helpi, Li deŝiris grandan strion de la basko de la ĉemizo libere pendanta, kaj faris en ĝi dek unu nodojn, unu pli granda ol la ceteraj; tia surogato servis al li kiel rozario en la tuta tempo de lia pentofarado, kaj li preĝis per ĝi unu milionon da *avemarías*. Sed lin tre ĉagrenis, ke li ne trovis ajnan ermiton por konfesado kaj konsolado, do li sin distris, promenante sur la herbejo kaj enskribante en la ŝelon de la arboj kaj en la fajnan sablon multe da versoj senescepte konformaj al lia trista humoro, kaj kelkajn en laŭdo de Dulcinea. Sed kompletaj kaj legeblaj vidiĝis poste nur la jenaj:

Arboj kaj arbustoj grandaj,
verdaj herboj de ĉi tero:
se al voĉoj vin vokantaj
vi vin turnas kun tolero,
jen la plendoj miaj sanktaj.
Traktas min Amor' despote,
sed ne zorgu vi, se vea
tie ĉi kaj ĝiseksplode
verŝas larmojn don Quijote,
ĉar forestas Dulcinea
de El Toboso.

En ĉi loko izolita
la amanto plej lojala
kaŝas sin de damo spita,
kaj al ĉi malbon' brutala
puŝis lin fatal' insida.
Lin la amo, ŝire, frote
taŭzas kun rigoro pleja;
ne mirinde, ke po-pote
verŝas larmojn don Quijote,
ĉar forestas Dulcinea
de El Toboso.

Serĉe al la aventuroj
inter ĉi rokaro raspa
li nur trovas malplezurojn
kaj pro ŝia koro aspra
ŝin riproĉas inter ĵuroj.
Vipas lin Amor' metode
trae sur la mol' glutea;
kun doloro subkulote
verŝas larmojn don Quijote,
ĉar forestas Dulcinea
de El Toboso.

La trovintoj de ĉi versoj tre ridis pri la aldono de «de El Toboso» al la nomo de Dulcinea, supozante, ke don Quijote certe imagis, ke la versojn oni ne bone komprenus, se li ne menciis ankaŭ «de El Toboso». Kaj ili ĝuste supozis, kiel don Quijote poste rekonis. Li skribis multe pli da versoj sed, kiel dirite, oni trovis kompletaj kaj povis deĉifri nur la tri menciitajn strofojn. Li pasigis do la tempon, skribante kaj krome suspirante kaj vokante al la faŭnoj kaj satirusoj de la tieaj arbaroj, al la nimfoj de la riveroj kaj al la trista kaj humida Eĥoa, ke ili respondu, konsolu kaj aŭskultu lin. Li ankaŭ serĉis herbojn por nutri sin per ili ĝis la reveno de Sancho. Sed, se estus pasintaj tri semajnoj ĝis la reveno de la ŝildisto, kaj ne tri tagoj, la Kavaliro de la Trista Mieno intertempe konsumiĝus tiel, ke eĉ la patrino lin naskinta ne povus lin rekoni.

Sed konvenas lasi lin ĉi-momente meze de liaj suspiroj kaj versoj kaj rakonti tion kio okazis al Sancho en ties karaktero de mesaĝisto. Alveninte al la ĉefvojo, li iris ale al El Toboso kaj la sekvantan tagon li atingis ĝis proksime al la gastejo, kie li suferis la misaventuron de la bernado. Kaj tuj kiam li ĝin vidis, ŝajnis al li, ke li denove flugas tra la aero, do li ne kuraĝis eniri, kvankam li alvenis en la ĝusta momento, se konsideri, ke estis la manĝohoro kaj li tre deziris gustumi ion varman, post tiom da tagoj en kiuj li manĝis nur fridaĵojn. Lia deziro puŝis lin pli proksimiĝi al la gastejo, kaj kiam li plu hezitis, ĉu eniri aŭ ne, elvenis du homoj, rekonis lin, kaj diris unu la alian:

—Diru, sinjoro licenciulo, ĉu la rajdanto tie ne estas Sancho Panza, kiu, laŭ la mastrumantino de nia hidalgo, foriris kun li en karaktero de ŝildisto?

—Jes, Sancho mem —respondis la licenciulo—, kaj li rajdas la ĉevalon de don Quijote.

Ili konis lin tre bone, ĉar temis pri la pastro kaj la barbiro de lia propra vilaĝo, la samaj homoj farintaj la proceson kaj la aŭtodafeon al la libroj. Plene rekoninte la ŝildiston kaj la ĉevalon, ambaŭ viroj, en sia deziro scii novaĵojn pri don Quijote, proksimiĝis al li, kaj la pastro vokis lin per ties nomo, dirante:

—Amiko Sancho Panza, kie troviĝas via mastro?

Sancho Panza tuj rekonis ilin kaj decidis riveli nek la lokon nek la staton, en kiuj troviĝis don Quijote. Li respondis do, ke lia mastro restas ie kaj sin okupas per afero al li tre grava, kaj ke li dirus nenion plian, eĉ se tio kostus al li la okulojn de la vizaĝo.

—Ne, ne, Sancho Panza —diris la barbiro—, se vi ne diras al ni, kie li restas, ni suspektos, fakte ni jam suspektas, ke vi murdis kaj prirabis lin, ĉar vi rajdas sur lia ĉevalo. Aŭ vi indikas al ni la lokon, kie la mastro de Rocinante troviĝas, aŭ estos al vi tre mave.

—Vi ne havas motivon por minaci min. Por nenio mi murdus aŭ rabus. Ĉiu mortu, kiam lia sorto volas, aŭ kiam Dio lin vokas. Mia mastro dediĉas sin pentofari meze de la montoj.

Kaj senhalte kaj ĝis la fino Sancho rakontis pri la stato de don Quijote, pri la serio de aventuroj al ili okazintaj kaj pri tio, ke li portas leteron al sinjorino Dulcinea de El Toboso, t.e. al la filino de Lorenzo Corchuelo, kaj ke don Quijote tiel adoras ŝin, ke li dronas en amo ĝis super la oreloj. La pastro kaj la barbiro miris ĉe la informoj de Sancho, kaj, kvankam ili jam sciis pri la naturo de la frenezo de don Quijote, ili remiris ĉiufoje, kiam ili aŭdis pri ĝi. Ili petis la ŝildiston montri al ili la leteron adresitan al sinjorino Dulcinea de El Toboso. Li respondis, ke ĝi estas skribita en notokajero kaj ke lia sinjoro ordonis lin, igi kopii la leteron sur paper-folion en la unua

vilaĝo ĉe la vojo. Tiam la pastro petis lin montri la leteron, kaj promesis kopii ĝin per tre bona kaligrafio. Sancho Panza serĉis la kajeron sub la ĉemizon, sed li ne trovis ĝin, kaj ĝin ne trovus eĉ se li serĉus ĝis nun, ĉar ĝi restis en la manoj de don Quijote, kaj Sancho siatempe forgesis ĝin peti de li.

Kiam Sancho vidis, ke la kajero ne aperas, lia vizaĝo ricevis palon de morto, li palpis al si tre rapide la tutan korpon, konstatis denove, ke la kajero mankas, kaj senplie li puŝis ambaŭ manojn en la barbon kaj deŝiris la duonon de ĝi. Poste senĉese kaj haste li donis al si du dekojn da pugnobatoj sur la vizaĝon kaj sur la nazon, ĝis ilin kovris la sango. Vidante tion, la pastro kaj la barbiro lin demandis, kio igas lin trakti sin mem tiel senkonsidere.

—Kio? —respondis Sancho—. Mi ĵus perdis en unu momento tri azenojn grandajn kiel kasteloj.

—Kiel okazis tio? —demandis la barbiro.

—Mi perdis la notokajeron —respondis Sancho—. En ĝin oni skribis la leteron por Dulcinea kaj unu mandaton kun la signaturo de mia sinjoro ordonantan ke lia nevino donu al mi tri el la kvar aŭ kvin azenoj, kiujn li havas ĉe si.

Tiam li rakontis ankaŭ pri la perdo de la azeno. La pastro lin konsolis kaj diris, ke siatempe li igos lian mastron renovigi la mandaton kaj skribi ĝin sur apartan paperon, laŭ la kutimoj kaj la reguloj, ĉar la mandatojn en not-kajeroj oni ne akceptas nek plenumas. Ĉe tio Sancho trankviliĝis kaj diris, ke, se la afero de la mandato tiel solviĝos, li ne tre bedaŭras la perdon de la letero al Dulcinea, ĉar li preskaŭ tute parkeris ĝin, do ili povus ĝin kopii, kie kaj kiam ili dezirus.

—Diru la tekston, Sancho —petis la barbiro—, kaj poste ni skribos ĝin.

Sancho Panza haltis, gratis al si la kapon por stimuli sian memoron, kaj jen li apogis sin sur unu piedo, jen sur la alia; kelkfoje li rigardis al la grundo, kelkfoje al la ĉielo, kaj, ronĝinte al si la duonon de la pulpo de unu fingro, dum la pastro kaj la barbiro atendis en suspenso liajn vortojn, li diris post tre longa paŭzo:

—Je Dio, sinjoro licenciulo, la diablo prenu kion mi memoras de la letero; tamen, ĉe la komenco, ĝi diris: «Suverena kaj cima sinjorino».

—Certe ĝi ne diris «cima», sed superlima, aŭ sublima sinjorino —rimarkis la barbiro.

—Vi pravas —diris Sancho—, kaj, se mi bone memoras, ĝi tekstis jene: «La vundito senfibra kaj dormomanka kisas al via moŝto la manojn, sendanka kaj nekonata belulino» kaj mi ne scias kion kroman ĝi diris pri sano kaj malsano, kiun li sendis al ŝi, kaj ĉio laŭ la sama stilo iris ĝis la subskribo: La Kavaliro de la Trista Mieno.

La pastron kaj la barbiron tre amuzis la bona memoro de Sancho, kaj ili laŭdis lin pro ĝi kaj petis lin ripeti dufoje la leteron, por ke ankaŭ ili povu parkeri kaj poste ĝin skribi siatempe. Sancho diris ĝin tri pliajn fojojn kaj trifoje li ripetis tri mil komikajn absurdojn. Poste Sancho rakontis pri aferoj de sia mastro, sed ne menciis eĉ per unu vorto la bernadon, kiun li suferis en la gastejo, kies pordon li ne kuraĝis nun trapasi. Li diris ankaŭ, ke, se li transdonus al sia sinjoro favoran respondon de sinjorino Dulcinea de El Toboso, don Quijote ekirus gajni al si la tronon de imperiestro aŭ, almenaŭ, de monarĥo, ĉar tion ili interkonsentis. Li aldonis, ke la afero ŝajnas facile efektivebla, se konsideri la kuraĝon de la kavaliro kaj la forton de lia brako, kaj, ke, sukcesinte en sia entrepreno, don Quijote donus al li kiel edzinon (ĉar tiam certe li estus vidvo) unu el la damoj pli

intimaj kun la imperiestrino, kiu damo ricevus herede riĉan kaj grandan ŝtaton sur firma tero, ĉar insuloj kaj insuletoj jam ne plu plaĉis al li. Sancho tiel flegme kaj sencece diris ĉion ĉi, dume elpurigante al si la nazon de tempo al tempo, ke la pastro kaj la barbiro miris denove, konsiderante, kiel forta estis la frenezo de don Quijote, ke ĝi povis renversi per sia influo la cerbon de la povra ŝildisto. Ili ne volis fari al si la klopodon elrevigi lin, pensante, ke pro tio, ke lia konscienco suferis nenian damaĝon, estus pli bone lasi lin en ties iluzio, kaj dume ili amuziĝus per liaj sensencaĵoj. Do ili rekomendis lin preĝi al Dio por la sano de sia sinjoro, ĉar tre eble kun la tempo li povus fariĝi imperiestro, kiel Sancho mem diris, aŭ, almenaŭ, ĉefepiskopo aŭ io en la sama rango.

—Nu, sinjoroj —diris Sancho—, se la fortuno tiel aranĝos la aferojn, ke mia mastro volos esti, ne imperiestro, sed ĉefepiskopo, mi dezirus scii nun kion kutime donas la vagantaj ĉefepiskopoj al ties ŝildistoj.

—Ordinare ili donas beneficon, aŭ senpostenan, aŭ kun pastraj funkcioj, aŭ la rangon de sakristiano. Tio havigas bonan renton fiksan plus proksimume samvaloran enspezon por religiaj servoj.

—Sed necesas por tio —diris Sancho—, ke la ŝildisto estu fraŭlo, kaj, ke, almenaŭ, li sciu helpi celebri la meson. Do ve al mi! Mi estas edzo kaj scias eĉ ne la unuan literon de la aboco. Kio okazus al mi, se mia mastro, spite al la kutimo reganta inter la vagantaj kavaliroj, kapricus fariĝi, ne imperiestro, sed ĉefepiskopo?

—Ne zorgu, amiko Sancho —diris la barbiro—. Ni parolos kun via mastro, lin konsilos kaj eĉ prezentos al li kiel aferon de konscienco, ke li fariĝu imperiestro, ne ĉefepiskopo. Krome tio estos al li pli facile, ĉar lia kuraĝo grandas pli ol lia klero.

—Mi opinias same —respondis Sancho—, kvankam verdire li lertas en ĉio. De mia flanko mi pensas peti la Eternulon, ke Li sendu lin tien, kie li povos pleje utili kaj doni al mi multajn rekompencojn.

—Vi parolas kiel diskreta homo kaj pensas kiel honesta kristano —diris la pastro—. Sed nun necesas trovi la manieron liberigi vian mastron de la vana pentofaro, kiun, laŭ vi, li plenumas; kaj por pli bone pensi pri la afero, kaj por manĝi, ĉar estas jam la tempo, prefere ni iru en la gastejon.

—Eniru vi ambaŭ, se vi volas —diris Sancho—. Mi atendos ĉi tie ekstere kaj poste mi diros al vi, kial ne konvenas al mi eniri. Sed bonvolu havigi al mi iom da varma manĝo kaj ankaŭ iom da hordeo por Rocinante.

Ili eniris kaj Sancho restis ekstere, sed post kelka tempo la barbiro elvenis momenton por transdoni al la ŝildisto iom da manĝo. Post ol la pastro kaj la barbiro diskutis pri la ideoj sekvindaj por la sukceso de ilia projekto, ili decidis efektivigi la planon, kiu venis en la kapon de la pastro, tre konforman al la humoro de don Quijote kaj al tio, kion ili celis. Laŭ tia plano, la pastro surmetus maskon kaj alivestus sin per la robo de vaganta pucelo, kaj la barbiro rolus, kiel eble plej bone, kiel ŝia ŝildisto. Poste ili irus renkonte al don Quijote, kaj la pastro, ŝajnigante sin pucelo forlasita kaj senhelpa, petus favoron, kiun don Quijote pro sia kavalireco ne povus rifuzi, nome, ke li akompanu ŝin, kien ajn ŝi lin kondukus, por ripari ofendon al ŝi faritan de malica kavaliro. Ŝi ankaŭ petus lin ne ordoni ŝin demeti la maskon nek demandi ion ajn pri ŝia persono, ĝis li venĝus ŝin kontraŭ la malica kavaliro. La pastro opiniis, ke don Quijote konsentos fari kion ajn oni petos de li laŭ tiu sistemo, kaj tiel ili sukcesos elpreni lin el la loko de la pentofaro kaj lin konduki al la vilaĝo, kie ili klopodos trovi ian rimedon al lia stranga frenezo.

Ĉapitro 27

Pri kiel efektivigis sian planon la pastro kaj la barbiro, kaj pri aliaj aferoj indaj je mencio en ĉi granda historio

La plano de la pastro ŝajnis al la barbiro, ne mava, sed tiel bona, ke ili tuj metis manon al la laboro. Ili petis de la gastejestrino jupon kaj mantilon kaj lasis garantie la novan sutanon de la pastro. La barbiro fasonis al si grandan barbon el ruĝe griza vosto bova, kiun la gastejestro uzis por tie alkroĉi la kombilon. Lia edzino demandis por kio ili volas la virinajn pecojn kaj la barbon, kaj la pastro skize rakontis al ŝi pri la frenezo de don Quijote kaj aldonis, ke ili bezonas tian aliveston por ellogi lin el la montaro.

La gastejestro kaj lia edzino tuj komprenis, ke la frenezulo, la gasto de la balzamo kaj la mastro de la bernita ŝildisto estas unu sama persono, kaj ili rakontis al la pastro pri ĉio okazinta ĉe ili, sen preterlasi la epizodon, kiun Sancho tiel multe deziris kaŝi. Nu, finfine la gastejestrino ekipis tiamaniere la pastron, ke eĉ ne la plej eta detalo mankis. Ŝi surmetis al li jupon el drapo ornamita per strioj el nigra veluro spane larĝaj kaj korsaĵon el verda veluro kun pasamentoj el blanka sateno. Tiel la jupo kiel la korsaĵo ŝajnis fasonitaj en la tempoj de reĝo Wamba.^[122] La pastro ne konsentis porti la mantilon kaj anstataŭe metis al si sur la kapon vatitan ĉapeton tolan, kiun li uzis por dormi dum la noktoj. Poste li zonis sian frunton per ĵartelo el nigra tafto, kaj el alia ĵartelo faris specon de masko kaj bone kovris per ĝi sian vizaĝon kaj sian barbon. Poste li surmetis sian ĉapelon, tiel grandan, ke ĝi povus taŭgi kiel ombrelo; kaj fine, envolvinte sin en la mantelon, li sidiĝis virinmaniere sur

la mulo, kaj la barbiro saltis sur la sian, kun la barbo parte ruĝa, parte griza kaj longa ĝis la talio, ĉar, kiel dirite, oni ĝin faris el la vosto de rufa bovo.

La du amikoj diris adiaŭ al ĉiu, ankaŭ al la bona Maritornes, kaj ŝi promesis, kvankam pekulino, trapreĝi rozarion, por ke Dio favoru ilin en tiel komplika kaj kristana tasko. Sed, apenaŭ ili elrajdis el la gastejo, venis al la pastro la penso, ke al li, kiel ekleziulo, tute ne decas aperi en tia alivesto, eĉ se al tio lin puŝis la plej bona intenco. Ĉi tion li diris al la barbiro kaj petis lin interŝanĝi la vestojn, aldonante, ke pli konvenus, se la barbiro ludus la rolon de afliktita pucelo, kaj li la rolon de ŝildisto, ĉar tiamaniere ne profaniĝus tiel multe lia digno. Li diris ankaŭ, ke, se la barbiro ne akceptus la ŝanĝon, li irus eĉ ne unu plian paŝon, kvankam la diablo mem forprenus don Quijote.

Ĉe tio Sancho aliĝis al ili kaj ne povis ne ridi, vidante ilin maskitaj. La barbiro akceptis la proponon de la pastro, kiu, pro la ŝanĝo de la roloj, informis al sia amiko kiel konduki kaj kion diri al don Quijote por konvinki lin forlasi la lokon, kie li sin dediĉis al tiel vana pentofaro. La barbiro respondis, ke li scios fari sian rolon sen bezono ricevi instrukciojn, kaj ke li surmetos la virinan veston, nur kiam ili alvenos proksime al la loko, kie don Quijote troviĝas. Li faldis do la veston, la pastro gardis la falsan barbon, kaj ili ekiris, gvidate de Sancho. Survoje la ŝildisto rakontis al ili la historion pri la frenezulo, kiun li kaj lia mastro trovis en la montoj, sed li diris nenion pri la valizo kaj ties enhavo, ĉar, kvankam duonstulta, li estis ankaŭ ulo avida.

La sekvantan tagon ili alvenis tien, kie Sancho lasis indikile la branĉojn por retrovi la vojon kondukantan al lia mastro. Kiam li rekonis la lokon, li diris al la aliaj, ke ili jam proksimas al don Quijote, kaj ke konvenus, ke ili alivestu sin, se tia travestio vere necesas por la liberigo de lia mastro. Ili jam

antaŭe informis la ŝildiston pri sia projekto kaj asertis, ke, por eltiri la kavaliron el ties mizera vivo, pleje necesas la virina vesto kaj la masko. Ili krome informis la ŝildiston, ke li devas nek sciigi lian mastron, kiuj ili estas, nek diri, ke li konas ilin. Kaj, ke, kiam don Quijote demandos lin, ĉar certe li demandos, ĉu li transdonis la leteron al Dulcinea, li diru, ke jes, kaj ke pro tio, ke ŝi ne scias legi, ŝi respondis buŝe, ordonante la kavaliron, aŭ iri tuj al ŝi pro afero grava, aŭ alie riski sin al ŝia disdegno. La du amikoj asertis al la ŝildisto, ke per tia respondo kaj per kelkaj kromaj aferoj, kiujn ili intencas diri siaflanke al don Quijote, ili povos preni lin al pli bona vivo, konvinkante lin ekiri tuj sur la vojon por fariĝi imperiestro aŭ monarĥo. Ili aldonis, ke Sancho ne devas timi, ĉar lia mastro tute ne fariĝos ĉefepiskopo.

Sancho aŭskultis kaj retenis ĉion en la memoro kaj dankis al ili ties intencon konsili lian mastron fariĝi, ne ĉefepiskopo, sed imperiestro, ĉar li certis, ke rilate la rekompencojn al la ŝildistoj, la imperiestroj troviĝas en pli bona situacio ol la ĉefepiskopoj. Sancho aldonis, ke estus bone, se li irus sola renkonti don Quijote por sciigi al li la respondon de lia damo, ĉar tia respondo sufiĉus por elpreni lin el la monto, sen ke la pastro kaj la barbiro farus al si novajn klopodojn. Ili trovis bona la ideon de Sancho, do decidis atendi tie ĝis la ŝildisto revenus kun la novaĵo, ke li renkontiĝis denove kun don Quijote.

Sancho penetris en la gorĝon de la monto, lasinte la du amikojn en valetio, kie fluis milda roĝo en la freŝa kaj agrabla ombro de rokoj kaj arboj. Estis arda tago de aŭgusto je la tria posttagmezo, kiam la varmo plej intensas, ĉefe en tiu regiono; la loko do ŝajnis des pli agrabla kaj ĝuinda por atendi tie la revenon de Sancho. La du amikoj kuŝiĝis sur la herbo kaj, kiam ili plaĉe ripozis en la ombro, ili aŭdis unu voĉon kanti dolĉe kaj melodie sen akompano de ajna instrumento; kaj ili miregis, pensante, ke tia loko ne ŝajnas

tre oportuna por tiel bona kantanto, ĉar, kvankam oni diras, ke en kampoj kaj arbaroj vivas paŝtistoj kun bonegaj voĉoj, temas, ne pri vero, sed pri fantaziaĵo de poetoj. Kaj ili eĉ pli miris, kiam ili aŭdis la vortojn de la kanto, proprajn, ne al krudaj paŝtistoj, sed al rafinitaj korteganoj, kiel konfirmis la jenaj versoj:

Kio tenas min en tristo-regno?

Disdegno.

Kio min kondamnas al konfuzo?

Ĵaluzo.

Kio puŝas min al kor-tempesto?

Foresto.

Sekve, evidentas sen kontesto,

ke rimedo al mi ne alvenos,

kaj al la despero min fortrenos

la ĵaluz', disdegno kaj foresto.

Kio vundas min per agonio?

Am-dio.

Kio aĉe traktas min per puno?

Fortuno.

Kio min submetas al kruelo?

Ĉielo.

Laŭ la volo do de mia stelo

min ekstermos ĉi malsano stranga,

ĉar komplotas por insido sanga

la am-di', fortuno kaj ĉielo.

Kio gvidos min al milda sorto?

La morto.

Kio igus vivi min sen ĝemo?

Ŝanĝemo.

Kio tiras amon al forgeso?

Frenezo.

Tiel do egalus al stulteco

voli resanigi sin de l' amo,
se nur venkas super ties flamo
morto kaj ŝanĝemo kaj frenezo.

La horo, la sezono, la soleco, la voĉo kaj la lerto de la
kantanto vekis admiron kaj plezuron en la du amikoj, kiuj
kviete atendis kun la espero aŭdi novan melodion. Sed la
silento tro daŭris kaj ili intencis iri serĉi la tiel bel-voĉan
kantulon. Tamen, kiam ili volis efektiviĝi sian ideon, la sama
voĉo venis denove al ili kaj tenis ilin senmovaj, dum ĝi
kantis la jenan soneton:

Benata amikeco, kiu pasas
sorante al la vasto empirea.
Feliĉas vi ĉe sanktular' tiea
kaj nur la ombron vian al ni lasas.

De tie vi kelkfoje embarasas:
konkordo montras sin per ŝajno fea,
sed eblas vidi tra la bel' livrea,
ke falso veras kaj sincero strasas.

Ho amikeco, lasu sferon dian
aŭ ne permesu, ke vin moku trompo,
rabante de vi la intencon puran.

Deprenu de la falso veston vian,
aŭ glitos re la mondo per disrompo
en la ĥaoson praan kaj teruran.

La kanto finiĝis per profunda suspiro kaj la du amikoj
atendis, ĉu aŭdiĝos alia melodio; sed la muziko turniĝis en
plendajn, plorajn veojn, kaj la pastro kaj la barbiro
interkonsentis eltrovi, kiu estas la persono lamentanta per
tiel bonega voĉo kaj tiel doloraj ĝemoj. Ili ne iris longe, kiam,
turninte sin ĉirkaŭ roko, ili vidis viron figure kaj aspekte

similan al la priskribo, kiun Sancho faris antaŭe pri Cardenio. Ĉi lasta, vidante ilin, teniĝis trankvile kaj nealarmite, kun la kapo penseme klinita super la brusto, kaj nur levis la rigardon unu fojon, kiam ili subite aperis antaŭ li.

La pastro, homo de facila parolo, sciis la kaŭzon de lia misfortuno, kaj, rekonante lin laŭ la priskribo de Sancho, proksimiĝis al li kaj per nur kelkaj sed trafaj vortoj provis persvadi lin rezigni tiel mizeran vivon, ĉar alie, li eĉ perdis ĝin tie, kio estus la pleja malfeliĉo. Cardenio, en tiu momento mense sana kaj libera de la krizoj de furiozo, kiuj tiel ofte frenezigis lin, ne povis ne miri, vidante la du virojn en vestoj tiel diferencaj de la kostumoj uzataj en tiuj solejoj; kaj eĉ pli li miris, kiam ili parolis al li pri liaj propraj aferoj, kvazaŭ temus pri io ĝenerale konata (tian impreson li ricevis de la vortoj de la pastro). Do li respondis jene:

—Mi vidas, sinjoroj, kiuj ajn vi estas, ke la ĉielo, zorganto de la bonaj kaj ofte ankaŭ de la malicaj, sendas, sen ke mi meritus tion, al ĉi fora dezerto tiel dista de la vojoj de la homoj, kelkajn personojn, por ke ili montru al mi per diversaj kaj trafaj argumentoj, kiel sensencan vivon mi vivas, kaj por ke ili provu preni min al pli bona loko. Sed, ĉar ili ne scias kion mi scias, nome, ke se mi eltirus min el ĉi mizero, mi falus en alian pli grandan, ili certe rigardas min stulta, aŭ, eĉ pli mave, freneza. Kaj ne surprize, ĉar mi mem rimarkas, ke mia aflikto tiel stampiĝis al mi en la imagon kaj puŝas min al tia frenezo, ke mi ne kapablas ĝin kontraŭstari kaj, ke, manka je sento kaj konscio mi turnas min kvazaŭ en ŝtonon. Ĉi tion mi konstatas, nur kiam oni diras kaj montras al mi kion mi faris, impulsive de tiel teruraj atakoj; kaj mi povas nur vane lamenti, senprofite malbeni mian sorton kaj, por ekskuzi miajn frenezaĵojn, rakonti ties kaŭzon al ajna persono volanta min aŭskulti. La prudentaj, kiam ili ekscias pri la kaŭzo de miaj misfortunoj, trovas komprenebla ĝian efikon, kaj, kvankam ili ne povas faciligi al mi la koron, ili

almenaŭ ne kulpigas min, kaj ilia ĉagreno pro mia aĉa konduto turniĝas je kompato pro mia bedaŭrinda sorto. Kaj se vi, sinjoroj, venas kun la sama intenco, kiel jam venis aliaj homoj, antaŭ ol vi komencu prudente min konsili, mi petas vin auŝkulti la historion de miaj misfortunoj, kaj eble tio igos vin ŝpari al vi la klopodon provi doni konsolon al afliktito nekonsolebla.

La du amikoj pleje deziris auŝkulti de lia propra buŝo la kaŭzon de lia misfortuno, do ili petis lin rakonti sian historion, kaj promesis fari nur kion li dezirus por konsolo lia aŭ por trovo de rimedo al lia stato.

Tiam la melankolia junulo komencis sian lamentindan historion, ripetante preskaŭ la samajn vortojn kaj frazojn, kiujn li uzis kelkajn tagojn pli frue antaŭ don Quijote kaj la paŝtistoj, kiam la historio restis nefinita kaŭze de majstro Elisabat kaj de la fervoro de don Quijote en la defendo de la digno de la vaganta kavalirismo. Sed feliĉe la junulo suferis ĉi-foje nenian atakon de frenezo, do li povis rakonti ĝis la fino. Kiam li atingis la epizodon pri la bileto trovita de don Fernando inter la paĝoj de Amadís de Gaŭlio,^[123] li diris, ke li tre bone memoras la biletan, kaj ke ĝi tekstis jene:

Luscinda al Cardenio:

Ĉiun tagon mi trovas ĉe via persono novajn virtojn, kaj ili min devigas kaj trudas eĉ pli ami vin. Sekve, se vi volus liberigi min de tia devo sen difekti mian honoron, vi facile povus fari tion. Mia patro vin konas kaj min amas; li ne deziras submeti mian volon kaj konsentos, ke vi havu min, se vi estimas min tiel, kiel vi diras kaj kiel mi kredas.

—Ĉi bileto movis min peti la manon de Luscinda, kiel dirite, kaj ĝi pruvis, en la opinio de don Fernando, ke ŝi estas unu el

la plej diskretaj kaj saĝaj virinoj de sia tempo. Kaj ĉi sama bileto vekis en li la deziron min detrui, antaŭ ol la projekto mia efektiviĝus. Mi sciigis al don Fernando pri la postulo de la patro de Luscinda, nome, ke mia propra patro petu ŝin de li, kaj tion mi ne kuraĝis proponi al mia patro, ĉar mi timis, ke li ne konsentus. Nu, kvankam li bone konis la rangon, bonon, virton kaj belon de Luscinda kaj tion, ke ŝi povus per siaj kvalitoj honori ajnan familion de Hispanujo, mi komprenis, ke li ne deziras, ke mi edziĝu, antaŭ ol scii kion duko Ricardo volas fari el mi. Resume, mi diris al don Fernando, ke mi ne kuraĝas paroli al mia patro, ne nur pro tiu obstaklo, sed ankaŭ pro aliaj nedifineblaj kaŭzoj, kiuj igis min timi, ke miaj deziroj neniam efektiviĝos. Don Fernando respondis, ke li surprenos paroli kun mia patro kaj igi lin trakti kun la patro de Luscinda. Ho ambicia Mario! Ho, kruela Katilino! Ho, krima Silo! Ho, mensoga Galalón! Ho, perfida Vellido! Ho, avida Judaso! Ho, venĝema Juliano! Perfida, kruela, mensoga kaj venĝema! Kian damaĝon faris al vi ĉi kompatinda mizerulo, kiu tiel plene rivelis al vi la sekreton kaj ĝojon de sia koro? Ĉu mi iel ofendis vin? Ĉu ĉiu vorto kaj konsilo mia ne havis kiel celon la kreskigon de via honoro kaj de via profito? Sed, kial mi plendas? Ve al mi! Kiam la misfortunoj falas de la steloj, furioze kaj tumulte kaskadante de la alto, nenia forto sur la tero kapablas ilin deteni, nek ia homa ruzo povas preventi ilin. Kiu povus imagi, ke don Fernando (kavaliro de nobela nasko, saĝa, dankoŝulda al mi pro miaj multaj servoj, kaj tute certa povi kontentigi siajn amajn dezirojn, kie ajn li volus) enbatus al si en la kapon preni de mi unu solan ŝafinon, kiun mi ne posedis ankoraŭ?

»Sed ni lasu ĉi vanajn kaj senfruktajn pensojn kaj reprenu la fadenon de mia kompatinda historio. Don Fernando, vidante ke mia ĉeesto obstaklus la realigon de lia falsa kaj malica plano, decidis sendi min al sia pli aĝa frato, ke mi petu de li kelkan monon por la pago de ses ĉevaloj, kiujn don Fernando aĉetis la saman tagon, kiam li decidis paroli al mia

patro. Tiel li havigis al si la ekskuzon por liberigi sin de mi kaj por pli neĝenate efektiviĝi sian fian intencon. Ĉu mi povus antaŭvidi lian grandan perfidon, aŭ eĉ imagi ĝin? Tute ne; kontraŭe, mi volis tuj ekiri fari la komision kaj ĝojis pro lia bona aĉeto. Tiun nokton mi parolis kun Luscinda, diris al ŝi kion mi interkonsentis kun don Fernando, kaj aldonis, ke ŝi havu firman esperon, ke niaj bonaj kaj ĝustaj deziroj fine realiĝos. Ŝi respondis, tiel sensuspekta kiel mi mem pri la perfido de don Fernando, ke mi plej baldaŭ revenu, ĉar, ŝi kredis, ke tuj kiam mia patro parolus kun la ŝia, nia sopiro plenumiĝus. Mi ne scias, kiel okazis, sed post ol ŝi diris tion, ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj kaj en ŝia gorĝo fariĝis tia nodo, ke ŝi ne povis diri eĉ unu plian vorton, kvankam ŝajne ŝi volus diri multe pli. Mi neniam vidis ĉe ŝi tian eksceson de emocio, kaj ĝi min surprizis, ĉar, ĝis tiam, ĉiufoje kiam, dank' al mia diligento kaj al mia bona sorto ni renkontiĝis, ni babilis ĝojaj kaj feliĉaj, kaj en niaj konversacioj mankis larmoj, suspiroj, ĵaluzoj, suspektoj kaj timoj; mi nur laŭdis ŝian belon, admiris ŝian virton kaj ŝian saĝon kaj dankis la ĉielon, ĉar ĝi donis ŝin al mi, kiel la sinjorinon de mia koro, kaj ŝi reciprokis, laŭdante, kiel enamiĝinta virino, kion ŝi rigardis laŭdinda en mi. Per tiaj babiladoj ni amuziĝis, rakontante unu la alian pri mil bagateloj kaj komentante pri niaj najbaroj kaj konatoj, kaj mi nur aŭdacis preni preskaŭ perforte unu el ŝiaj belaj, blankaj manoj kaj kovri ĝin per kisoj kiom permesis la dense lokitaj stangoj de la fenestra krado inter ni. Sed la nokton antaŭan al la trista tago de mia ekiro, ŝi ploris, ĝemis kaj suspiris, kaj, kiam ŝi retiriĝis, ŝi lasis min plena de konfuzo kaj timo, ĉar ŝi ne kutimis riveli tian elmontron de doloro kaj emocio. Sed, por ne detrui mian esperon, mi atribuis ĉion al la intenso de ŝia amo al mi, kaj al la aflikto, kiun la foresto kaŭzas al la veraj amantoj. Nu, mi forvojaĝis trista kaj enpena, kun la menso plena de imagoj kaj suspektoj: klaraj antaŭsignoj de la mizera kaj nigra fato min atendanta.

»Alveninte al la loko, kien oni min sendis, mi transdonis la leteron al la frato de don Fernando. Li varme min akceptis, sed, anstataŭ lasi min reveni, li ordonis min atendi, ĉe mia granda ĉagreno, ok tagojn en loko, kie la duko, lia patro, ne povus vidi min, ĉar, laŭ la asertoj de la frato de don Fernando, ĉi lasta petis, ke la monon oni havigu al li, sen ke lia patro sciu. Sed ĉio ĉi estis maĥinacio de don Fernando, ĉar lia frato havis monon sufiĉan kaj povus tuj forsendi min kun ĝi. Mi sentis grandan inklinon ne obei tian ordonon, ĉar ŝajnis al mi neeble teni min tiom da tagoj for de Luscinda, des malpli, ke mi lasis ŝin en tiel trista stato. Tamen mi obeis kiel bona subulo, kvankam mi komprenis, ke tio kostus al mi la sanon.

»Sed, kvar tagojn post mia alveno prezentiĝis tie unu viro, serĉis min kaj transdonis al mi leteron, kies adreso montris, ke ĝi venas de Luscinda, ĉar la skrib-karaktero estis ŝia. Mi ĝin apertis timotreme, konvinkite, ke io vere grava movis ŝin skribi al mi, se konsideri, ke tion ŝi apenaŭ faris, kiam mi loĝis proksime al ŝia hejmo; sed, legonte la leteron, mi demandis al la kuriero tion, kiu donis ĝin al li, kaj kiom longe li estis survoje. Li respondis, ke, kiam ĉe la tagmezo li vagis sur strato de la urbo, tre bela sinjorino vokis lin de fenestro, kaj, kun la okuloj plenaj de larmoj, diris rapide: «Frato, se, kiel ŝajnas, vi estas kristano, mi petas vin je la amo de Dio, ke vi plej rapide portu ĉi leteron al la loko kaj al la persono, bone konataj, montritaj en la adreso. Per tio vi faros grandan servon al Nia Sinjoro, kaj, por ke ne manku al vi la necesaj rimedoj por la plenumo de mia peto, jen prenu kion ĉi poŝtuko entenas». Tion dirante, ŝi ĵetis al mi tra la fenestro unu poŝtukon, kie mi trovis cent realojn, ĉi oran ringon kaj la leteron. Poste, sen atendi mian respondon, ŝi retiris sin de la fenestro, kvankam unue ŝi vidis min preni la leteron kaj la poŝtukon kaj signi al ŝi, ke mi faros, kiel ordonite. Vidante min tiel bone pagita por la laboro alporti la leteron, kaj sciante per la adreso, ke oni devus enmanigi ĝin al vi (kaj mi

bone konas vin, sinjoro), mi, pelate ankaŭ de la larmoj de la bela sinjorino, decidis, ne konfidi la leteron al alia persono, sed mi mem ĝin alporti al vi. Kaj de kiam ŝi donis al mi la leteron, mi iris en dek ses horoj kvindek kvar mejlojn, tio estas, la distancon de la urbo al ĉi tie, kiel vi scias.

»Dum la afabla kaj improvizita kuriero diris ĉion ĉi, mi pendis de liaj vortoj, kaj miaj kruroj tiel tremis ke mi apenaŭ povis stari. Nu, fine mi apertis la leteron, kaj ĝi diris jene:

Don Fernando plenumis sian promeson paroli kun mia patro, sed li tion faris, ne je via nomo, sed por sia profito. Sciu, sinjoro, ke li petis mian manon, kaj ke mia patro, kredante ke don Fernando avantaĝe superas vin, konsentis tiel rapide, ke post du tagoj okazos sekrete kaj private la edziĝo, ĉar ĝin atestos nur la ĉielo kaj kelkaj personoj de la domo. Imagu do mian staton. Se vi opinias, ke vi devas veni, jam venu. La sekvo de ĉi afero igos vin vidi, ĉu mi amas vin, aŭ ne. Dio volu, ke ĉi letero atingu vin, antaŭ ol mia mano kuniĝos kun la mano de viro, kiu tiel fie rompis sian promeson.

»Ĉe tia letero mi tuj ekiris sen atendi la monon aŭ ion alian. Mi klare komprenis, ke ne la aĉeto de la ĉevaloj, sed la kontentigo de liaj deziroj movis don Fernandon sendi min al sia frato. La kolero en mi bolanta kontraŭ don Fernando kaj la timo perdi la trezoron, kiun mi akiris tra multaj jaroj da amo kaj sindono, sendube donis al mi flugilojn, ĉar la sekvantan tagon mi atingis la urbon, ĝuste en la horo konvena por iri paroli al Luscinda. Mi ŝtele enrajdis, lasis la mulon ĉe la bona homo alportinta al mi la leteron kaj bonŝance mi trovis Luscindan ĉe la fenestro, kies krado estis la daŭra atestanto de nia amo. Ŝi tuj rekonis min; tamen, ne kiel ni devus rekoni unu la alian. Sed, ĉu ekzistas unu sola persono en la mondo povanta arogi, ke li penetris ĝiskomprene la konfuzan menson kaj la varian naturon de

virino? Certe, eĉ ne unu. Nu, tuj kiam Luscinda vidis min, ŝi diris: «Cardenio, mi jam portas la kostumon por la geedziĝa ceremonio, kaj atendas min en la salono la perfida don Fernando, mia avida patro kaj aliaj atestontoj; sed ili atestos, ne mian edziniĝon, sed eble mian morton. Ne konsterniĝu, amiko, kaj klopodu ĉeesti ĉi oferadon. Se mi ne povos eviti ĝin per miaj argumentoj, mi portas kaŝitan ponardon, kaj, metante per ĝi finon al mia vivo, mi venkos eĉ la plej rigoran oponon kaj pruvos en la sama tempo, kiel multe mi amis kaj amas vin».

»Konsternita, mi haste respondis, ĉar mi timis, ke oni povus interrompi nin: «Viaj agoj, sinjorino, konfirmu viajn vortojn. Se vi havas ponardon por teni vin fidela al via ĵuro, mi havas glavon por vin defendi, aŭ, se la fortuno montros sin kontraŭa, por mortigi min».

»Mi kredas, ke ŝi ne povis aŭdi ĝis la fino, ĉar oni urĝe vokis ŝin, tiel, ke la edziĝonto atendis. Ĉe tio densiĝis la nokto de mia tristo, subiris la suno de mia ĝojo, estingiĝis la lumo de miaj okuloj kaj obskuriĝis la kompreno de mia menso. En mia konfuziteco mi ne kapablis trovi la pordon de la domo, ne povis fari eĉ unu solan paŝon. Sed konsiderante, kiel necesa estus mia ĉeesto tie por ajna eventualo, mi rekuraĝigis min plej eble kaj eniris en ŝian domon; mi konis tre bone ties internon kaj, krome, pro la konfuzo reganta oni ne rimarkis min. Do, nevidate mi kaŝis min en la salono mem, en la embrazuro de fenestro kovrita per kurtenoj, inter kies faldoj kaj randoj mi povis observi, ne observate, ĉion, kio okazis en la salono. Mi ne povus diri nun, kiom angore batis mia koro, dum mi staris tie, aŭ kiom da pensoj kaj konsideroj venis al mi en la kapon; ili estis tiel multaj kaj de tia naturo, ke oni nek povas, nek devas diri ilin. Sufiĉas, ke vi sciu, ke don Fernando eniris en la salonon en sia ordinara vesto, sen specialaj garnoj, kaj lin akompanis, kiel atestonto, unu kuzo, je la unua grado, de Luscinda. La ceteraj ĉeestantoj estis nur

la servistoj de la domo. Iom poste el iu ĉambro eniris Luscinda, akompanate de sia patrino kaj de du siaj servistinoj, kaj ŝi, vestita kaj garnita konforme al siaj rango kaj belo, ŝajnis la personigo mem de la eleganto kaj de la kortega gloro.

»Mi tiel raviĝis kaj ekstazis, admirante ŝin, ke mi ne havis okazon detale observi ŝian kostumon; mi povis distingi nur ties kolorojn, blankan kaj ruĝetan, kaj la glimadon de la juveloj kaj gemoj kovrantaj ŝiajn kapoveston kaj kostumon; sed super ĉio venke brilis la eksterordinara belo de ŝiaj blondaj haroj, kiuj konkure kun la gemo kaj la lumo de kvar torĉoj ardantaj en la salono, eĉ pli bele rivelis ŝian ĉarmon al miaj okuloj. Ho, memoro detruanta mian pacon! Kial vi prezentas nun al mi la senegalan belon de la adorata turmentantino mia? Ĉu ne estus pli bone, se vi, kruela memoro, bildigus en mi kion ŝi poste faris, por ke mi, pelate de tiel granda ofendo, provu, ne venĝi min, sed almenaŭ perdi la vivon? Ne tediĝu, sinjoroj, aŭdante, kiel mi ekskursas el la temo. Mian aflikton oni ne povas rakonti supraĵe kaj koncize, ĉar ŝajnas al mi, ke ĉiu el ĝiaj cirkonstancoj meritas longan komenton.

La pastro respondis al tio, ke ili sentas, ne enuon, sed grandan plaĉon aŭskultante la detalojn, ĉar ili estas interesaj kaj menciindaj kaj meritas la saman atenton ol la kerno de la rakonto.

—Nu, bone —daŭrigis Cardenio—. Kiam ili ĉiuj troviĝis en la salono, eniris la paroĥestro, prenis la manojn de la geedziĝa paro por plenumi la koncernan ceremonion kaj diris: «Sinjorino Luscinda, ĉu vi akceptas la ĉi tie ĉeestantan sinjoron don Fernando kiel leĝan edzon, konforme al la preskriboj de nia Sankta Patrino, la Eklezio?».

»Mi elŝovis la kapon kaj la kolon el inter la kurtenoj kaj kun atentega orelo kaj angorplena animo mi pretis aŭskulti la respondon de Lusinda, atendente de ŝiaj vortoj, aŭ mian kondamnon je morto, aŭ la konfirmon de mia vivo. Ho, se mi estus kuraĝinta elpaŝi kaj diri laŭte: «Lusinda, Lusinda, zorgu kion vi faros, pensu kion vi ŝuldas al mi! Memoru, ke vi estas mia, kaj ke vi ne povas aparteni al alia viro. Sciu, ke, se vi diros jes, mia vivo finiĝos en la sama momento. Kaj vi, perfida don Fernando, rabanto de mia gloro, morto de mia vivo, kion vi volas? Kion vi pretendas? Pensu, ke vi ne povas, kiel kristano, plenumi viajn dezirojn, ĉar Lusinda estas mia edzino, kaj mi, ŝia edzo».

»Kiel sence mi kondukis! Nun, troviĝante for de la danĝero, mi diras, ke mi devintus fari kion mi ne faris. Nun, lasinte, ke oni ŝtelu mian karan trezoron, mi insultas la ŝteliston, kvankam mi devus venĝi min kontraŭ li, se mi havus kuraĝon por tio, kaj ne nur por plendi. Tiam mi kondukis stulte kaj timeme; ne strange do, ke mi mortas nun freneza, pentanta kaj en infamio.

»La pastro atendis la respondon de Lusinda, kaj ŝi hezitis longe antaŭ ol ĝin doni. Kaj, kiam mi pensis, ke ŝi eltiros tuj la ponardon por teni sin fidela al sia vorto, aŭ ke ŝi levos sian voĉon por diri la veron aŭ ion al mi favoran, mi aŭdis ŝin murmuri feble kaj sveneme: «Jes, mi volas». Don Fernando diris la samon, donis al ŝi la ringon kaj, tiel, nedisigebla ligilo kunigis ilin. La novedzo proksimiĝis brakumi la edzinon, sed ŝi metis al si la manon sur la koron kaj falis duonsvene en la brakojn de sia patrino. Al mi mankas ankoraŭ priskribi mian mensan staton en la momento, kiam mi vidis, ke per ŝia «jes» trompiĝis mia espero, pruviĝis falsaj la vortoj kaj promesoj de Lusinda kaj neebliĝis al mi reakiri mian perditan trezoron. Mi restis manka je konsilo, forlasita de la ĉielo, abomenata de la tero min nutranta... la aero rifuzis al mi spiron por miaj veoj, kaj la akvo, humidon por miaj

larmoj; nur la fajro tiel kreskis en mi, ke mi brulis de furiozo kaj ĵaluzo.

»La sveno de Luscinda ĵetis ĉiujn en konfuzon. Ŝia patrino dekroĉis al ŝi la bruston de la kostumo, por ke ŝi spiru pli facile, kaj sub la korsaĵo aperis faldita papero. Don Fernando tuj kaptis ĝin, kaj, ĝin leginte ĉe la lumo de unu el la torĉoj, sidiĝis sur seĝo kaj profunde enpenisa metis al si la manon sur la vangon, sen atenti, ke la aliaj personoj donas helpon al lia edzino, por ke ŝi rekonsciiĝu.

»Kiam mi vidis la domon en tiela alarmo kaj konfuzo, mi decidis eliri, sen zorgi, ĉu oni vidos min aŭ ne, ĉar mi havis la intencon, se oni min surprizus, fari tian teruraĵon, ke ĉiuj komprenus la justan indignon de mia koro, vidante min puni la falsan don Fernando kaj eĉ la svenan kaj ŝanĝeman perfidulinon. Sed mia sorto sendube rezervis min al pli grandaj mavoroj, se tiaj ekzistas, ĉar ĝi ordonis, ke mi en tiu momento konservu tute la racion, kiu mankis al mi poste. Tiel do, anstataŭ venĝi min kontraŭ miaj plej grandaj malamikoj (kio estus facila, ĉar ili havis nenian suspekton pri mia ĉeesto), mi decidis puni min mem eĉ kun pli da rigoro ol mi uzus kontraŭ ili, se mi ilin mortigus, ĉar per morto subita malaperas subite ankaŭ la sufero, dum la morto prokrastita de torturoj ĉiam pereigas sen fakte meti finon al la vivo.

»Fine mi eliris el ŝia hejmo kaj revenis al la persono, en kies domo mi antaŭe lasis la mulon. Li ĝin selis, kaj, sen diri adiaŭon al li, mi saltis sur la beston, elrajdis el la urbo kaj, kiel alia Loto, ne kuraĝis turni la okulojn por rigardi retro. Vidante min sola en la kamparo, dum la obscuro de la nokto min envolvis, kaj la silento invitis min senlime plendi, ĉar oni ne povus koni aŭ aŭskulti min, mi komencis krii furioze, insultante Luscindan kaj don Fernandon, kvazaŭ mi povus venĝi min tiel kontraŭ la ofendo, kiun ili faris al mi. Mi nomis ŝin kruela, sendanka, falsa, sed ĉefe, avidema, ĉar la riĉo de

mia rivalo blindigis al ŝi la okulojn de la amo, prenis ŝin de mi kaj ŝin donis al viro, kies fortuna montriĝis pli malavara kaj favora ol la mia.

»Tamen, meze de miaj kolero kaj insultoj, mi klopodis ekskuzi ŝin, dirante, ke estas kompreneble, ke pucelo retenita ĉe siaj gepatroj kaj kutimanta obei ilin, submetas sin senproteste al ilia volo, se konsideri, ke ili donas ŝin edzinige al kavaliro tiel riĉa kaj nobela kiel don Fernando. Krome, se ŝi rifuzus lin, oni rigardus ŝin sensenca, aŭ oni suspektus, ke ŝi dediĉas sian amon al alia viro, kio damaĝus ŝian reputacion kaj honoron. Mi pensis aliflanke, ke, se ŝi estus dirinta, ke mi iĝis ŝia edzo, ŝiaj gepatroj sendube rekonus, ke ŝi ne elektis malbone kaj certe ili ŝin pardonus, se konsideri, ke antaŭ ol don Fernando proponis sin kiel edzon, ili nek renkontus, nek dezirus pli bonan partion ol min. Mi estus apoginta ŝian aserton kaj konfirminta ĉion, kion ŝi volus elpensi ĉi-rilate. Do, mi konkludis, ke manko de amo kaj de saĝo, eksceso de ambicio kaj ŝato al la pompo igis ŝin forgesi la promeson, per kiu ŝi trompis, kuraĝigis kaj subtenis min en mia firma espero kaj en miaj honestaj deziroj.

»Mi rajdis la ceteron de la nokto en tiu angora stato, ĉe la mateniĝo atingis pasejon al ĉi montaroj, kaj, penetrante en ilin, vagadis tri tagojn for de vojoj kaj padoj ĝis kelkaj herbejoj, kies precizan situon mi ne konas. Tie mi demandis al paŝtistoj, kie troviĝas la plej aspra kaj dezerta parto de la montoj, kaj ili respondis montrante al ĉi direkto. Mi aliris do ĉi tien kun la intenco meti en ĉi loko finon al mia vivo. Kiam mi alvenis al la unuaj krutaĵoj, mia mulo falis morta de laco kaj malsato, aŭ, kiel mi kredas, por liberigi sin de tiel senutila pezo, kia mi estas. Do mi ekiris piede, konsumita kaj malsata, kaj nek renkontis ian helpon, nek venis al mi la penso ĝin serĉi. Mi kuŝiĝis sur la grundo kaj restis tie, mi ne scias kiom da tempo. Fine mi levis min sen senti malsaton.

Apud mi staris pluraj kapristoj, kaj sendube ili jam kontentigis mian neceson, ĉar ili sciigis min, ke, kiam ili min trovis, mi diradis tiom da absurdoj, ke klare vidiĝis, ke mi perdis la saĝon. Jam de tiam mi konscias, ke mia menso ne daŭre fartas bone; de tempo al tempo ĝi iĝas tiel febla kaj senorda, ke mi faras mil frenezaĵojn, ŝirante al mi la veston kaj vane ripetante la amatan nomon de la malamikino mia. En tiaj momentoj mi havas nur la celon kaj deziron kriadati ĝismorte, kaj, kiam mi rekonsciiĝas, mi sentas min tiel laca kaj muelita, ke mi povas apenaŭ movi min. Mi ordinare loĝas en ajna kava trunko de kverko sufiĉe vasta ŝirmi ĉi mizeran korpon mian. La bovistoj kaj kapristoj de ĉi montoj nutras min, movataj de karitato. Ili metas la manĝon ĉe la vojoj kaj rokoj, kie, ili pensas, mi povas ĝin trovi. Tiel, en la okazoj kiam la saĝo mankas al mi, la natura neceso igas min rekoni la manĝon kaj vekas en mi la deziron ĝin gustumi kaj la volon ĝin preni. La paŝtistoj diras al mi, kiam ili renkontas min mense sana, ke en aliaj okazoj, mi atakas ilin sur la vojo de la vilaĝo al la diversaj ŝafejoj de la montoj kaj perforte prenas de ili la manĝon, kvankam ili deziras volonte doni ĝin al mi. Tiel pasas la lasta parto de mia mizera vivo, ĝis la ĉielo volos, aŭ meti al ĝi finon, aŭ viŝi el mia memoro la belon kaj perfidon de Luscinda kaj la ofendon de don Fernando. Se la ĉielo volos senmemorigi min, ne prenante de mi la vivon, miaj pensoj sekvos alian pli bonan kurson; alie, mi nur povas preĝi al Dio, ke Li kompatu min en Sia mizerikordo, ĉar mi ne sentas min sufiĉe forta por eltiri min el ĉi mizero, en kiun mi mem ĵetis min.

»Tia estas, sinjoroj, la amara historio de miaj misfortunoj. Diru, ĉu oni povas ĝin aŭskulti kun malpli da emocio, ol mi mem montris rakontante ĝin. Kaj ne klopodu konsili aŭ persvadi min preni ian efikan rimedon, kian povos inspiri al vi via saĝo, ĉar la medikamento estus tiel vana, kiel la preskribo de ajna fama doktoro al paciento ne volanta lin obei. Mi ne volas sanon sen Luscinda; kaj, ĉar al ŝi plaĉis

aparteni al alia viro, kiam ŝi estis, aŭ devus esti, mia, al mi plaĉas doni min al la aflikto, anstataŭ esti feliĉa. Per sia ŝanĝiĝemo ŝi volis igi mian perdiĝon konstanta, kaj de mia flanko mi volas ĝisfine detruigi min por kontentigi ŝian deziron. Kaj la futuraj generacioj vidos, ke nur al mi mankis tio, kion havas en abundo la aliaj mizeruloj: ilin konsolas la fakto, ke konsolo tute ne ekzistas por ili; sed ĉi tio estas por mi la kaŭzo de plej grandaj afliktoj kaj malbonoj, kaj mi pensas, ke ili vivos en mi eĉ post mia morto.

Tiel finis Cardenio sian longan kaj tristan historion de amo. Sed ĝuste kiam la pastro sin preparis diri al li kelkon da konsolaj vortoj, lin detenis de tio voĉo venanta al ili kun morna tono kaj diranta kion oni rakontos en la kvara parto de ĉi historio, ĉar ĉi tie la klera kaj detalema Cide Hamete Benegeli metas finon al la tria.

[122] Tio estas, en tre antikva epoko. Wamba, aŭ Vambo, estis visigota reĝo (672-680)

[123] Nova preteratento de Cervantes. Laŭ la ĉapitro 24-a, kiam Luscinda petis de Cardenio la libron pri Amadís, don Fernando jam antaŭe legis la bileton.

Ĉapitro 28

Pri la nova kaj agrabla aventuro okazinta en Sierra Morena al la pastro kaj al la barbiro

Feliĉa, feliĉega estis la epoko, kiam la sentima kavaliro don Quijote de La Mancha elrajdis en la mondon, ĉar, pro lia nobla decido revivigi kaj restarigi la jam perditan kaj preskaŭ mortintan ordenon kavaliran, ni ĝuas en la nuna tempo, tiel manka je plaĉaj distroj, ne nur la ĉarmon de lia aŭtentika historio, sed ankaŭ ties rakontojn kaj novelojn, kiuj montriĝas ne malpli agrablaj, artaj kaj veraj ol la propra historio, kies karditan, retorditan kaj bobenitan fadenon ni reprenas nun. Ĝi diras, ke, ĝuste kiam la pastro volis konsili Cardenion, lin deturnis de tio trista voĉo jene plendanta:

—Ho, Dio! Ĉu eble mi alvenis fine al loko utiligebla kiel sekreta tombo por ĉi korpo mia, kies pezan ŝarĝon mi tiel kontraŭvole portas? Mi kredas, ke jes, se ne estas ŝajna la soleco de ĉi montoj. Ve al mi! Pli agrablos al mi la akompano de ĉi rokoj kaj vepro, ĉar inter ili mi povos levi al la ĉielo miajn plendojn, ol la ĉeesto de iu ajn homo, se konsideri, ke de neniu sur la tero mi ricevus konsilon en miaj duboj, konsolon en miaj afliktoj, aŭ rimedon en miaj misfortunoj.

La pastro kaj liaj kompanoj aŭdis klare ĉion ĉi, kaj ĝuste pensante, ke la plendulo troviĝas proksime, ili iris serĉi lin, faris apenaŭ dudek paŝojn kaj vidis trans rokego junulon, kiu en kampula kostumo sidis ĉe frakseno. Ili ne povis distingi lian vizaĝon, ĉar li tenis la kapon klinita super la akvo de rojo, sur kies bordo li lavis al si la piedojn. Tiel silente ili proksimiĝis, ke li aŭdis nenion, atenta nur al la lavado de siaj piedoj, kiuj tute similis al du pecoj de blanka kristalo

inter la ŝtonoj de la roĵo. La pastro kaj la aliaj miris je la blanko kaj belo de tiaj piedoj, kiuj videble ne havis la kutimon treti terbulojn aŭ iri post plugiloj kaj bovoj, eĉ se la vesto de la junulo sugestis la malon. La pastro iris ĉefronte, kaj rimarkante, ke la junulo ne vidis ilin, li faris signon al siaj du kompanoj, ke ili kaŝu sin post kelkaj rokoj tie starantaj; farinte tion, ili observis kun atento la junulon kaj vidis, ke li portas grizan manteleton du-baskan alĝustigitan al la talio per blanka tuko, pantalonon kaj gamaŝojn el griza ŝtofo, kaj, sur la kapo, ĉapon grizan. La gamaŝoj, suprentiritaj ĝis la duono de la kruroj, rivelis ilin blankaj kiel alabastro. Li finis lavi siajn belajn piedojn kaj, kiam li prenis el sub la ĉapo la tukon por viŝi ilin, li levis la kapon, kaj la rigardantoj havis tiam la okazon vidi vizaĝon tiel senegale belan, ke Cardenio flustris al la pastro: «Ĉar tio ne estas Luscinda, temas ne pri homa, sed pri dia persono».

La junulo demetis la ĉapon, skuis la kapon de flanko al flanko, kaj tiam komencis liberiĝi kaj diskaskadi haroj kapablaj vekti la envion de la sunaj radioj. Ĉe tio, la rigardantoj komprenis ke la sidanta persono estas ne kampulo, sed virino delikata kaj pli bela ol la ceteraj virinoj ĝis tiam vidataj de la pastro kaj la barbiro. Eĉ la propra Cardenio opinius same, se li ne konus Luscindan, ĉar li poste deklaris, ke nur la belon de Luscinda oni povus kompari kun la belo de tiu junulino. La longaj kaj blondaj haroj kovris al ŝi ne nur la dorson, sed eĉ la tutan korpon escepte de la piedoj. Tiel abundan kaj densan hararon ŝi havis, ke ŝi uzis la fingrojn kombilmaniere, kaj, se ŝiaj piedoj ŝajnis en la akvo pecoj el kristalo, ŝiaj manoj inter la haroj similis al pecoj de pura neĝo; ĉio ĉi pliintensigis la miron de la tri rigardantoj kaj ties deziron koni ŝin. Ili do decidis montri sin, sed, kiam ili moviĝis por ekstari, la bela knabino levis la kapon, apartigis per la du manoj la harojn de sur la okuloj kaj turnis la rigardon al la irantoj. Ekvidinte ilin, ŝi tuj levis sin kaj, sen halti por surmeti la ŝuojn aŭ religi la harojn,

haste prenis apude kuŝantan sakon, kiu ŝajne enhavis tolaĵon, kaj volis forkuri plena de surprizo kaj timo; sed, farinte apenaŭ ses paŝojn per siaj delikataj piedoj, ŝi falis al la grundo, ĉar ŝi ne kapablis elteni la akron de la ŝtonoj. Vidante tion, la tri viroj iris al ŝi, kaj la pastro parolis unua:

—Haltu, sinjorino, kiu ajn vi estas. Ni deziras nur servi vin, do ne ekzistas motivo por via forkuro. Nek viaj piedoj povus vin porti, nek tion ni konsentus.

Ŝi tiel plenis de embaraso kaj surprizo, ke ŝi ne respondis eĉ unu vorton. Ili do pli proksimiĝis, la pastro prenis ŝin je la mano kaj diris:

—Kion via kostumo, sinjorino, kaŝas, tion rivelas viaj haroj. Evidentas, ke pro motivo tre grava vi maskis vian belon per tiel kruda vesto kaj venis al ĉi dezerta loko, kie nur hazarde ni renkontis vin; kaj se ni ne povos alporti rimedon al via misfortuno, ni povos almenaŭ konsili vin, ĉar nenia malfeliĉo povas pezi kaj sin trudi ĝis la ekstremo, ke ĝi rifuzus al sia viktimo, ke tiu aŭskultu konsilon bonintencan. Tiel, do, sinjoro, sinjorino, aŭ kion ajn vi preferas, formetu la timon, kiun kaŭzis al vi nia apero, kaj rakontu vian feliĉan aŭ tristan historion; ni, kune kaj unuope, helpos vin priplori vian misfortunon.

Dum la pastro parolis, la alivestita knabino ŝajnis trafita de stuporo kaj rigardis ilin sen movi la lipojn kaj sen diri eĉ unu vorton, kiel kampulo, al kiu oni subite montras raraĵon al li nekonatan. Sed la pastro insistis per la samaj argumentoj, kaj fine ŝi rompis sian mutecon, profunde suspirante.

—Se konsideri, ke ĉi dezertaj montoj ne povis kaŝi min, kaj ke miaj disligitaj haroj ne permesas mian langon mensogi, estus vane de mia flanko ŝajnigi ion, kion vi akceptus nur pro ĝentilo. Tiel do, sinjoroj, mi dankas vin pro via kunsento,

kiu devigas min kontentigi vian scivolon, kvankam mi timas, ke la rakonto de miaj misfortunoj vekos en vi ne nur kompaton, sed ankaŭ aflikton, ĉar vi povos trovi nek rimedon, nek konsolon por ili. Tamen, por ke vi ne havu dubojn pri mia honoro, kvankam vi konstatis, ke mi estas virino, juna, sola kaj en ĉi kostumo (cirkonstancoj sufiĉaj, kune aŭ unuope, por detruiri ajnan honestan reputacion) mi rakontos kion mi preferus kaŝi se eble.

Ĉion ĉi diris la knabino tiel senhezite, elokvente kaj dolĉe, ke la tri viroj admiris ŝian inteligenton ne malpli ol ŝian belon. Ili proponis al ŝi denove sian helpon kaj petis ŝin rakonti sian historion, kiel ŝi ĵus promesis. La knabino pudore metis al si la ŝuojn, religis la harojn, sidiĝis sur ŝtono kaj senplie, klopodante retenis la larmojn, ke ili ne fluu, ŝi komencis la historion de sia vivo per voĉo egala kaj klara:

—Ĉi tie, en Andaluzio, ekzistas vilaĝo, kies nomon titolo portas unu duko, grandulo de Hispanujo. Li havas du filojn: la pli aĝa heredos lian staton kaj ŝajne ankaŭ lian virtan koron. Kaj rilate al la pli juna, mi ne scias kion li heredos, se ne la perfidon de Vellido kaj la trompon de Galalón. Miaj gepatroj, de humila nasko kaj farmistoj de la duko, estas tamen tiel riĉaj, ke, se ilia rango egalus ilian havon, ili povus deziri nenion plian, kaj mi ne suferus mian nunan misfortunon, ĉar eble mia mizera sorto fontas de tio, ke ili ne naskiĝis nobeloj. Verdire ilia rango ne estas honte basa, sed ankaŭ ne tiel alta, ke mi ne rigardus ĝin la kaŭzo de mia mizera sorto. Resume, ili estas kampuloj, homoj simplaj sed oldaj kristanoj, sen unu guto de pagana sango en la vejnoj. Iliaj riĉo kaj reputacio iom post iom gajnas por ili la titolon de hidalgo kaj eĉ de kavaliro, kvankam ili konsideras kiel plej grandan riĉon kaj titolon, ke mi estas ilia filino. Kaj pro tio, ke ili, la plej amoplenaj gepatroj de la mondo, ne havis alian idon, ili dorlotis min, kiel neniam antaŭe oni dorlotis filinon. Mi estis la spegulo, kie ili sin rigardis, la bastono de

ilia olda aĝo, la objekto, kune kun la ĉielo, de ilia tuta amo. Kaj tiel bonaj ili estis, ke ilia volo ĉiam koincidis kun la mia; mi mastris en ilia koro, kaj same en la bieno. Mi dungis kaj eksigis la servistojn, tenis la kontojn pri ĉio, kion oni semis kaj rikoltis, pri la ole-muelejoj, la uvo-premejoj, la abelujoj, la hufobestoj maĵoraj kaj minoraj... resume, pri ĉio, kion povas posedi riĉa kampulo. Mi mastrumis kaj administris plej skrupule, ĉe la plena kontento de mia patro, kaj en mia libera tempo, post ol mi traktis kun submastroj, paŝtistestroj kaj aliaj laboruloj, mi distris min per okupoj propraj kaj konvenaj al la puceloj, kiel la brodado kaj ofte la ŝpinado; kaj se kelkfoje mi lasis ĉi taskojn por nutri mian spiriton, mi prenis pian libron aŭ ludis harpon, ĉar la sperto montris al mi, ke la muziko trankviligas la agitiĝojn de la koro kaj mildigas la zorgojn, kiuj fontas de la animo. Tia estis mia vivo en la gepatra domo, kaj mi ĝin priskribas iom detale ne pro vanto, aŭ pro la deziro, ke oni vidu, ke mi riĉas, sed por montri, ke mi falis de bona stato en la mizeron, kie mi senkulpe sidas nun.

»Mi vivis do plene okupata kaj en retiriĝo komparebla al tiu de monaĥino, kaj opiniis, ke nur la servistoj de la domo havis la ŝancon vidi min, ĉar mi iris al la meso frue en la mateno kun mia patrino kaj pluraj servistinoj, kaj tiel kaŝita sub vualoj, ke mi apenaŭ rimarkis ion krom la grundo antaŭ miaj piedoj. Sed la okuloj de la amo, aŭ pli ĝuste, la linke akra rigardo de la pigro eltrovis min iun tagon: la rigardo de don Fernando, la pli juna filo de la duko antaŭe menciita.

Tuj kiam ŝi prononcis la nomon de don Fernando, Cardenio paliĝis, ŝvitegis kaj montris tiel grandan emociion, ke la pastro kaj la barbiro timis, ke li falas en unu el la atakoj de frenezo, kiuj, kiel ili sciis, trafis lin de tempo al tempo. Sed Cardenio nur ŝvitis, sen fari ian movon, kaj fikse rigardis la kampulinon, suspektante, kiu ŝi estas. La junulino ne rimarkis la agitiĝon de Cardenio kaj daŭrigis sian historion:

—Tuj kiam li min vidis, kiel li poste diris al mi, li sentis sin kaptita de fortega pasio, kaj baldaŭ liaj agoj tion konfirmis. Sed por plej baldaŭ fini la rakonton de mia misfortuno, mi silentos pri la paŝoj, kiujn li faris, ĝis li deklaris al mi sian amon. Li subaĉetis ĉiun serviston de mia domo, donis kaj promesis donacojn al miaj parencoj, pasigis la tagojn en mia strato inter festoj kaj amuzoj; kaj en la noktoj, la muziko lasis dormi neniun. La nekalkuleblaj biletoj venintaj, mi ne scias kiel, al miaj manoj, plenis de amaj deklaroj kaj konfesoj kaj enhavis pli da ĵuroj kaj promesoj ol da silaboj. Ĉio ĉi, anstataŭ moligi min, igis min pli nefleksebla, kvazaŭ li estus mia ĝismorta malamiko, kaj liaj klopodoj efikis kontraŭe al liaj deziroj. Ne pensu, ke ne plaĉis al mi la ĝentilo de don Fernando, aŭ ke mi trovis lian insistadon troa; male; ke tiel grava nobelo admiris kaj deziris min, kaŭzis al mi nedifineblan plezuron, kaj mi ne povis ne ŝati tion, ke li min laŭdis en siaj biletoj, ĉar mi pensas, ke kiom ajn ni, virinoj, turpas, ĉiam plaĉas al ni esti nomataj ĉarmulinoj.

»Sed al ĉio ĉi oponis mia pudoro kaj la konstantaj konsiloj de miaj gepatroj. Ili bone konis la intencon de don Fernando, ĉar li tute ne zorgis kaŝi ĝin antaŭ la mondo. Ili diris al mi, ke ilia reputacio kaj honoro dependas de mia virto, kaj ke mi ne devus forgesi la diferencon de rango inter don Fernando kaj mi, por kompreni, ke li ne deziris mian bonon, sed nur kontentigi sian propran plezuron, eĉ se li asertus la malon. Ili aldonis, ke se mi volus meti finon al liaj arbitraj pretendoj, ili volonte edzinigus min al la viro, kiun mi dezirus en la urbo aŭ en la distrikto, ĉar tion atingus ilia riĉo kaj mia bona famo. Konvinkite de la vero de iliaj argumentoj kaj de la solido de iliaj promesoj, mi tenis min eĉ pli firme, kaj neniam respondis al don Fernando unu solan vorton, kiu povus doni iometon da espero al lia pretendo.

»La singardon mian li prenis sendube por disdegno, kaj tio certe ekscitis lian lascivan apetiton. Mi ne povas nomi alie

lian pasion, kaj cetere, se li estus sentinta decan amon, vi nenion sciis, ĉar ne ekzistus la okazo ĝin rakonti. Nu, fine don Fernando aŭdis, ke miaj gepatroj volas edzinigi min por meti finon al lia espero, aŭ, almenaŭ, por havigi al mi unu plian gardanton, kaj tio puŝis lin fari la jenon: iun nokton, kiam mi sidis en mia ĉambro kun nur unu servistino, kaj kun la pordoj bone riglitaj por pli bone ŝirmi mian virton, subite, sen ke mi povus imagi, kiel li enŝteliĝis malgraŭ mia singardo, mi vidis lin en la soleco kaj silento de la ĉambro. Lia apero tiel ŝokis min, ke miaj okuloj iĝis blindaj, kaj mia lango, senmova. Mi do ne povis krei, kaj eĉ se mi povus, tion li certe evitus, ĉar li proksimiĝis kaj prenis min inter siaj brakoj. Kiel dirite, en mia konfuziteco kaj stuporo, mankis al mi forto por defendi min.

»Li komencis paroli al mi, kaj mi ne komprenas, kiel la mensogo povas lerti tiel, ke ĝi kombinas aron da falsaj vortoj kaj vidigas ilin veraj. La perfida don Fernando klopodis kreditigi per larmoj siajn promesojn kaj per suspiroj sian intencon; kaj mi, kompatinda, sola, sensperta en tiaj aferoj, iel komencis kredi veraj tiom da falsaj ĵuroj, kvankam liaj larmoj kaj suspiroj inspiris al mi nur honestan kompaton. Rekonsciiĝinte de mia stuporo, mi komencis parte reakiri mian perditan spiriton, kaj diris kun pli da kuraĝo ol mi kredis havi: «Sinjoro, se anstataŭ esti en viaj brakoj, mi troviĝus inter la ungoj de sovaĝa leono, kaj povus liberigi min de ĝi, nur dirante aŭ farante ion kontraŭan al mia honoro, tiel neeble estus al mi tia faro aŭ diro, kiel modifi la paseon. Kvankam vi premas al mi la korpon per viaj brakoj, mian animon ŝirmas la puro de miaj honestaj pensoj, kiuj estas tre diferencaj de la viaj, kiel vi konstatos, se vi insistos realigi vian intencon per forto. Mi estas farmistino via, sed ne via sklavo. La nobeleco de via sango nek povas nek devas doni al vi la rajton senhonorigi kaj ofendi la humilon de la mia. Cetere mi konsideras min, kiel kampulino kaj farmistino, ne malpli bona ol vi kiel sinjoro kaj nobelo. Ne

pensu, ke vi sukcesos superforti min, aŭ delogi min per viaj riĉoj, aŭ trompi min per viaj vortoj, aŭ kortuŝi min per viaj larmoj kaj suspiroj. Se tiel kondukus la viro, kiun miaj gepatroj destinus al mi kiel edzon, mi cedus al lia volo kaj lin obeus, kaj, ĉar mi ne perdus la honoron, mi donus al li senreziste, eĉ se ne kompleze, kion vi pretendas nun per forto. Ĉi tion mi diras, por ke vi sciu, ke neniu krom mia laŭleĝa edzo atingos ion de mi». «Se nur tio zorgigas vin, belega Dorotea», tiel mi nomiĝas, la kompatinda al vi parolanta, «nu, jen, mi donas al vi mian manon kiel promeson, ke mi estos via edzo, kaj ĉi veron atestu la ĉielo, de kiu nenio kaŝiĝas, kaj la jena figuro de Nia Sinjorino», diris la perfidulo.

Kiam Cardenio aŭdis ŝin diri, ke ŝi nomiĝas Dorotea, li denove agitiĝis, vidante, kiel konfirmiĝis tio, kion li dekomence suspektis. Sed li ne volis interrompi ŝian historion, ĉar li deziris aŭskulti ĝis la fino kion li jam preskaŭ tute divenis. Li nur diris:

—Via nomo do estas Dorotea, sinjorino? Mi jam aŭdis pri alia Dorotea, kies misfortunoj ŝajnas similaj al la viaj. Sed bonvolu daŭrigi, poste mi diros al vi ion, kio samtempe ŝokos kaj doloros vin.

Frapita de la vortoj kaj de la stranga kaj ĉifona kostumo de Cardenio, Dorotea petis lin tuj diri kion ajn li sciis pri ŝiaj aferoj, ĉar la sorto lasis al ŝi ion bonan: la kuraĝon alfronti ajnan eventualan malfeliĉon, tial, ke ŝi havis la certecon, ke nenio pli terura ol ŝia nuna misfortuno povus trafi ŝin.

—Se konfirmiĝos plene tio, kion mi imagas, mi ne hezitos diri al vi pri kio temas, sinjorino —respondis Cardenio—. Sed en la nuna momento ne necesas, ke mi parolu.

—Laŭ via plaĉo —diris Dorotea—. Nu, daŭrigante mian rakonton, mi aldonu, ke don Fernando prenis sanktan figureton kaj metis ĝin kiel atestanton de nia kuniĝo. Per konvinkaj promesoj kaj solenaj ĵuroj li trudis al ŝi la devon edziĝi al mi, kvankam, antaŭ ol li finis paroli, mi petis, ke li pensu bone kion li faras, kaj ke li konsideru, kiel furiozus lia patro, se li vidus lin edziĝinta al juna kampulino, al unu el liaj propraj farmistinoj; mi aldonis, ke mia beleco ne blindigu lin, ĉar, kiom ajn ĝi estis, ĝi ne sufiĉis por pravigi lian eraron, kaj ke, se li volus fari bonon pro amo al mi, li devus lasi min iri sur la vojo propra al mia pozicio en la vivo, ĉar neniam la misedziĝoj konservas longe la ĝojon de la unuaj tagoj. Ĉi argumentojn, kaj multajn kromajn kiujn mi ne memoras, mi kontraŭmetis al li; sed ili ne deturnis lin de lia intenco; li kondukis kiel homo, kiu kontraktante pri negoco, facile akceptas ĉiun kondiĉon, ĉar li ne pensas pagi. Mi iom cerbumis tiam kaj diris en mi: «Certe mi ne estus la unua leviĝi de humila al alta stato pere de edziĝo, nek don Fernando, pelate de beleco, aŭ pli probable, de blinda amo, estus la unua preni al si kunulinon de suba rango. Mi farus do nenion novan, sekve estus bone akcepti ĉi honoron, kiun la sorto prezentas al mi, ĉar, eĉ se lia amo daŭrus nur ĝis la kontentigo de lia deziro, finfine mi estus lia edzino antaŭ la okuloj de Dio. Aliflanke, se mi disdegne repuŝos lin, li ignoros sian devon, uzos la forton, senhonorigos min, kaj poste mi ne povos pravigi min, nek kontentige ekspliki, ke mi havas nenian kulpon. Per kiaj rezonoj mi persvadus miajn gepatrojn kaj la ceterajn personojn, ke ĉi sinjoro eniris neinvitite en mian ĉambron?».

»Ĉi konsideroj kirliĝis momente en mia menso, sed al tio, kio poste kaŭzis mian perdiĝon, ĉefe inklinigis min la ĵuroj, la alvokataj atestantoj, la larmoj kaj, fine, la alloga aspekto kaj la ĉarmo de don Fernando. Ĉio ĉi kune, krom liaj multaj elmontroj de vera amo, povus facile konkeri la koron de ajna virino, eĉ se ŝi estus pli virta ol mi.

»Mi vokis mian servistinon, por ke ŝi estu tera atestanto apud la atestantoj ĉielaj. Don Fernando ripetis kaj konfirmis siajn ĵurojn, alvokis ankoraŭ aliajn sanktulojn, rezervis al si mil malbenojn, por la okazo se li ne plenumus sian promeson, larmis denove, suspiris pli profunde kaj premis min pli forte inter siaj brakoj, kies ĉirkaŭpremon mi ne sukcesis rompi. Ĉe tio la servistino eliris el la ĉambro, mi ĉesis esti pucelo, kaj li kronis sian agon de mensoga perfidulo.

»La tagiĝo sekvis la nokton de mia misfortuno, sed ne tiel baldaŭ kiel sendube don Fernando volis, ĉar, kiam viro kontentigas sian apetiton, lia plej granda deziro estas foriri. Mi tion diras, ĉar, eĉ antaŭ ol vidiĝis la helo de la aŭroro, don Fernando rapide lasis min kaj forglitis, gvidate de la servistino, kiu pli frue ankaŭ penetrigis lin ŝtele en la domon. Adiaŭante min, li diris (kvankam kun malpli da varmo kaj insisto ol kiam li alvenis), ke liaj ĵuroj estas firmaj kaj veraj, kaj ke mi fidu lian promeson; kiel plian konfirmon de siaj vortoj, li detiris de sia fingro riĉan ringon kaj ĝin ŝovis sur la mian. Fine li foriris, kaj mi ne scias, ĉu mi tristicis aŭ ĝojis; mi certas nur, ke mi sentis min perpleksa, agitata kaj preskaŭ ekster mi, kaŭze de tiel stranga okazo. Mi, aŭ ne havis kuraĝon, aŭ ne memoris severe riproĉi la servistinon pro ties perfido kaŝi don Fernandon en mia ĉambro, ĉar mi ankoraŭ ne konsciis, ĉu tio ĵus okazinta al mi estis afero bona aŭ bedaŭrinda. Ĉe la momento de lia foriro, mi diris al don Fernando, ke, ĉar mi estis jam lia, li povus viziti min la proksimajn noktojn, ĝis li dezirus fari publikan deklaron de nia geedziĝo. Li revenis nur la sekvantan nokton, kaj dum pli ol unu monato mi ne povis vidi lin en la strato nek en la preĝejo; vane mi serĉadis lin, kvankam mi sciis, ke li troviĝas en la urbo, kaj ke preskaŭ ĉiutage li iras ĉasi.

»Vere, tiuj tagoj kaj horoj estis por mi plenaj de mizero kaj doloro, kaj mi komencis dubi, kaj eĉ ne kredi, pri la sincero

de don Fernando; mi memoras, ke mi faris al mia servistino, pro ŝia perfido, la riproĉojn, kiujn ĝis tiam mi ŝparis al ŝi, kaj ankaŭ, ke mi retenis miajn larmojn kaj klopodis serenigi mian mienon, ĉar mi timis, ke miaj gepatroj povus demandi min pri la kaŭzo de mia tristo, kaj tiam mi devus respondi per ajna mensogo. Sed alvenis la momento, kiam tiaj antaŭzorgoj abrupte ĉesis: mi blinde ignoris ĉian respekton kaj prudentan rezonon, perdis la paciencon, kaj miaj sekretaj pensoj iĝis publike konataj.

»Ĉio ĉi okazis kiam, post kelka tempo, mi aŭdis, ke don Fernando edziĝis, en najbara urbo, al knabino belega kaj de honorinda familio, kvankam ne tiel riĉa, ke ŝia doto povus havigi al ŝi tiel altrangan edzon. Oni diris, ke ŝi nomiĝas Luscinda, kaj ke en ŝia edziniĝo okazis pluraj strangaĵoj.

Aŭdinte la nomon de Luscinda, Cardenio nur levetis la ŝultrojn, mordis al si la lipojn, kuntiris la brovojn kaj tuj poste liaj okuloj fariĝis du fontoj de larmoj. Tamen Dorotea daŭrigis sian historion, dirante:

—Kiam mi aŭdis la tristan novaĵon, mia koro, anstataŭ frostiĝi, brulis per tia furiozo, ke mi apenaŭ povis eliri al la strato kaj krie proklami la perfidon kaj la infamion al mi faritajn. Sed mia kolero kvietiĝis, kiam mi decidis efektivigi ian planon tiun saman nokton. Mi pruntis ĉi kostumon disde paŝtisto laboranta je la servo de mia patro kaj konfidis al li mian sekreton. Mi petis de li, ke li min akompanu ĝis la urbo, kie, laŭ la famo, troviĝis la perfida don Fernando. La paŝtisto riproĉis min pro mia manko de prudento kaj trovis mian intencon absurda, sed, vidante min neŝanceligebla en mia decido, li konsentis akompani min, kiel li diris, ĝis la fino de la mondo. Mi tuj metis en tolan saketon virinan veston, kaj kelke da juveloj kaj mono por ajna eventualo, kaj en la silento de la nokto, dirante nenion al la perfida servistino, eliris el mia hejmo kaj, akompanate de la paŝtisto kaj de miaj

angoraj pensoj, ekiris piede al la urbo. Mi urĝiĝis sur la vojo kun la deziro alveni plej baldaŭ, ne por malhelpi kion oni jam faris, sed almenaŭ por demandi al don Fernando, kiel li povis fari al mi tian fiagon.

»Post du tagoj kaj duono mi alvenis al la urbo, kaj demandis al la unua preterpasanto pri la situacio de la domo de la gepatroj de Luscinda. Li donis al mi pli da informoj ol mi dezirus; li indikis al mi la domon kaj krome rakontis ĉion okazintan en la edziniĝo de Luscinda, afero tiel konata en la urbo, ke la homoj formis grupojn por babili pri ĝi. Li diris, ke la nokton de la geedziĝo, tuj post ol Luscinda donis sian konsenton esti edzino de don Fernando, ŝi profunde svenis, kaj, ke, kiam li deligis al ŝi la korsaĵon, por ke ŝi pli facile spiru, li trovis sub ĝi bileton skribitan de ŝia propra mano. Luscinda deklaris en la bileto, ke ŝi ne povos esti la edzino de don Fernando, ĉar ŝi jam edziniĝis al Cardenio (kiu, laŭ la asertoj de la preterpasanto, estis unu el la ĉefaj nobeloj de la urbo) kaj ke ŝi diris «jes» al don Fernando nur por obei siajn gepatrojn. Resume, ŝajnas, ke, laŭ la cetera teksto de la bileto, Luscinda havis la intencon mortigi sin tuj post la fino de la ceremonio, kaj tio konfirmiĝis kiam, laŭdire, oni trovis ponardon ie sub ŝia kostumo. Tiam don Fernando, kredante ke Luscinda mokis, disdegnis kaj ofendis lin per sia konduto, tiel koleriĝis, ke li atakis ŝin, antaŭ ol ŝi rekonsciiĝis, kaj li ne vundis ŝin per la sama ponardo trovita sur ŝi, ĉar tion malhelpis ŝiaj gepatroj kaj la ceteraj ĉeestantoj. Oni diris, ke don Fernando tuj foriris de la urbo, ke Luscinda ne rekonsciiĝis ĝis la sekvanta tago, kaj, ke, tiam, ŝi diris al ŝiaj gepatroj, ke ŝi estas la edzino de tiu Cardenio antaŭe menciita. Mi aŭdis ankaŭ, ke Cardenio ĉeestis la ceremonion kaj, ke, kiam li vidis ŝin edziniĝinta, kion li neniam povus imagi, li profunde desperis kaj foriris de la urbo, lasinte leteron, en kiu li plendis pri la nefideleco de Luscinda kaj deklaris sian decidon apartiĝi de la homoj por ĉiam.

»Ĉio ĉi estis publike konata en la tuta urbo, kaj ĉiu parolis pri ĝi, precipe kiam kuris la famo, ke ankaŭ Luscinda malaperis el sia hejmo kaj urbo, ĉar oni vidis ŝin nenie; kaŭze de tio ŝiaj gepatroj preskaŭ freneziĝis kaj ne sciis kion fari por retrovi ŝin. Tia novaĵo animis min; mi pensis, ke pli bone estis al mi ne trovi don Fernandon, ol trovi lin edziĝinta; ke eble ekzistas ankoraŭ rimedo por mia misfortuno; ke la ĉielo malhelpis lian duan edziĝon sendube por igi lin kompreni ke, kiel kristano, li devas atenti la sanon de sia animo pli ol la logon de la mondaĵoj. Ĉi pensoj rondiris en mia menso kaj konsolis min per esperoj vanaj kaj nebulaj, por ke mi eltenu ĉi abomenindan vivon.

»Mi estis ankoraŭ en la urbo kaj ne sciis kion fari pro la foresto de don Fernando, kiam, iun tagon, mi aŭdis urban kriiston; li anoncis riĉan rekompencan al la persono min trovonta, kaj laŭte priskribis mian aĝon kaj kostumon. Aliflanke, mi eĉ aŭdis la onidiron, ke la paŝtisto min akompananta delogis kaj fortiris min de ĉe miaj gepatroj, kaj tio profunde afliktis min, ĉar mi komprenis, kiel malalten falis mia reputacio, ne nur pro tio, ke mi forkuris, sed ankaŭ pro la fakto ke mi tion faris kun ulo tute ne inda je mia persono.

»Tuj kiam mi aŭdis la kriiston, mi foriris de la urbo kun la paŝtisto, kiu jam komencis montri kelkan ŝanceliĝon en sia promesita fideleco, kaj, tiun nokton, pelate de la timo esti trovitaj, ni venis en la koron de ĉi densejo. Sed mavo naskas mavon, kiel oni diras, kaj la fino de unu misfortuno kutime signas la komencon de alia pli granda; tion mi spertis, ĉar mia bona paŝtisto, ĝis tiam fidela kaj fidinda, vidante min en ĉi solejo, puŝate de sia friponeco pli ol de mia belo, volis profiti la okazon kaj, sen timo al Dio kaj sen respekto al mi, faris al mi senhontan proponon. Kiam mi respondis al li kun justa indigno, li ne plu petis kaj komencis uzi la forton. Sed la ĉielo, kiu malofte, aŭ neniam, ĉesas prizorgi kaj favori la

virton, tiel favoris la mian, ke malgraŭ mia febla forto, mi sukcesis, sen multa peno, faligi lin en ravinon, en kies fundo li restis, mi ne scias ĉu viva aŭ morta. Poste, kurante pli rapide ol mi povus esperi de mia laco kaj angoro, mi plu penetris inter ĉi montoj kun la nura penso kaj deziro kaŝi min de mia patro, kaj de la personoj, kiuj serĉis min en lia nomo.

»Mi ne scias kiom da monatoj pasis, de kiam mi venis ĉi tien, kie posedanto de gregoj trovis min, prenis min kiel sian serviston kaj kondukis min al vilaĝo kaŝita en la denso de ĉi montoj. Mi laboris por li kiel paŝtisto kaj klopodis esti ĉiam en la makiso por kaŝi ĉi harojn, kiuj tiel neatendite ĵus perfidis min. Tamen miaj antaŭzorgoj kaj ruzoj vanis, ĉar mia mastro, eltrovante, ke mi ne estas viro, kovis la saman perfidan ideon, kiel mia paŝtisto. Sed, ĉar la fato ne ĉiam provizas tujan rimedon kontraŭ ĉiu bato sia, ne aperis ĉi-okaze ravino aŭ profundaĵo, kien mi povus faligi la mastron same kiel mi faligis la paŝtiston, do, mi denove vagis ĉi tie, serĉante lokon, kie, neĝenate, mi povus peti de la ĉielo kun larmoj kaj suspiroj, ke ĝi kompatu min kaj donu al mi forton kaj gracon sufiĉan, por ke mi liberiĝu de mia misfortuno, aŭ, almenaŭ, por ke mi mortu inter ĉi solejoj sen lasi memoron pri ĉi mizerulino, kiu, kvankam senkulpa, donis motivon por ke la homoj parolu mavon pri ŝi, tiel en ŝia lando, kiel en la fremdaj teroj.

Ĉapitro 29

Pri la sprito de la bela Dorotea kaj pri aliaj tre plaĉaj kaj amuzaj aferoj

—Tia estas, sinjoroj, la vera rakonto de mia tragedio. Vi aŭdis min suspiri kaj plendi, kaj vi mem juĝu, vidante la larmojn flui de miaj okuloj, ĉu mi ne havas motivon por verŝi ilin eĉ pli abunde. Vi konas jam la naturon de mia misfortuno, do vi komprenos, ke vanas konsoloj, ĉar ekzistas kontraŭ ĝi tute nenia rimedo. Mi nur petas de vi favoron, kiun vi devas kaj povas facile fari: indiki al mi lokon, kie mi povus pasi la vivon, sen la konstanta timo kaj angoro esti trovita de miaj serĉantoj; ĉar, kvankam mi scias, ke miaj gepatroj amas min tiel multe, ke ili bonvole reakceptus min, tia hontego posedas min, ĉe la nura penso aperi antaŭ ili tute diferenca ol kiel ili dezirus, ke ekzili min por ĉiam ŝajnas al mi pli bone, ol rigardi ilian vizaĝon kaj pensi en la sama tempo, ke ili rigardas la mian kaj ne trovas en ĝi la virton, kiun ili certe deziris vidi ĉiam en mi.

Ŝi ĉesis paroli, kaj ŝiaj vangoj ruĝe koloriĝis, klare montrante la doloron kaj la honton de ŝia animo, dum la aŭskultantoj sentis en la koro kompaton kaj admiron ĉe ŝia misfortuno. Tiam la pastro volis konsoli kaj konsili ŝin, sed Cardenio antaŭiĝis al li, dirante:

—Tiel do, sinjorino, vi estas la bela Dorotea, solfilino de la riĉa Clenardo...

Dorotea miris, kiam ŝi aŭdis la nomon de sia patro, despli kiam ŝi observis la mizeran aspekton de la viro, ĉar, kiel menciite, Cardenio havis sur si ĉifonan veston.

—Kaj vi, frato,^[124] kiu vi estas? Kial vi konas la nomon de mia patro? —demandis Dorotea—. Ĉar, se mi bone memoras, mi ne eldiris ĝin eĉ unu fojon dum la tuta rakontado de mia misfortuno.

—Mi estas —li respondis— la kompatinda Cardenio, la homo, kiun, laŭ viaj diroj, Luscinda deklaris sia edzo. La fia konduto de la viro kondukinta vin al via nuna situacio, reduktis ankaŭ min al ĉi stato, kie mi troviĝis duonnuda, en ĉifonoj, manka je ĉia homa konsolo kaj, plej bedaŭrinde, manka je racio, ĉar mia menso bone funkcias nur dum kurtaj periodoj, kiam la ĉielo tion permesas. Mi, Dorotea, estas la viro atestinta la ĵur-rompon de don Fernando kaj atendinta ĝis Luscinda, dirante «jes», akceptis lin kiel edzon. Mi estas la viro malhavinta la kuraĝon sufiĉan por atendi tion, kio okazus post ŝia sveno kaj post la trovo de la bileto sub ŝia korsaĵo; mia animo ne povis elteni tiom da doloro samtempe, tiel do, nekapabla plu suferi, mi elglitis el la domo, iris al mia gastiganto, enmanigis al li leteron, petis lin transdoni ĝin al Luscinda, kaj mi venis al ĉi solejoj kun la intenco, lasi min konsumiĝi ĉi tie, ĉar de tiu momento la vivo fariĝis al mi tute abomeninda.

»Sed la sorto ne volis preni de mi la vivon, kaj senigis min nur je la racio, sendube gardante min, por ke mi havu ĉi bonan ŝancon renkonti vin; ĉar, se via historio estas vera, kion mi firme kredas, la ĉielo eble rezervos pli bonan finon al niaj misfortunoj, ol ni supozas. Vere, se Luscinda ne povas edziniĝi al don Fernando, ĉar ŝi estas mia, kiel ŝi publike deklaris, kaj don Fernando ne povas edziĝi al ŝi, ĉar li estas via, espereble la ĉielo redonos al ni tion nian, se konsideri, ke nenio neriparebla plenumiĝis. Tiel do, ĉar ni havas ĉi konsolon, kaj ĝi ne fontas de neatingeblaj esperoj nek baziĝas sur absurdaj fantazioj, mi petas vin, sinjorino, ke vi ŝanĝu vian decidon, kiel mi pretas ŝanĝi la mian, antaŭ la eblo de pli bona futuro. Kaj kiel kristano kaj kavaliro mi

Ĵuras, ke mi ne vin forlasos, antaŭ ol vidi vin kiel edzinon de don Fernando; se miaj argumentoj ne povos konvinki lin, ke li plenumu sian devon, mi uzos mian kavaliran rajton kaj lin defios kaŭze de lia senkaŭza konduto. Rilate al liaj ofendoj al mi, mi lasos, ke la ĉielo min venĝu, dum mi venĝos vin sur la tero.

Dorotea aŭskultis kun kreskanta miro la vortojn de Cardenio kaj fine, ne sciante kiel danki tiel grandan sindonon, penis kisi al li la piedojn, kion Cardenio ne konsentis. La pastro, parolante al ili du, laŭdis la grandanimecon de Cardenio, kaj per konsiloj kaj petoj persvadis ilin akompani lin al lia vilaĝo, kie ili povus provizi sin per ĉio necesa, kaj kie oni decidus, aŭ serĉi don Fernandon, aŭ konduki Dorotean al ŝiaj gepatroj, aŭ fari finfine kion ili konsiderus plej konvena.

Ankaŭ la barbiro, ĝis tiam aŭskultinta ĉion ĉi en silenta miro, faris paroladeton, kaj, kun ne malpli da bonvolo ol la pastro, proponis sin por plenumi je ilia favoro kion li povus. Krome, li rakontis supraĵe al Dorotea kaj Cardenio, kial li venis ĉi tien kun la pastro; poste li menciis la strangan frenezon de don Quijote kaj diris, ke ili atendas la revenon de lia ŝildisto, irinta serĉi sian mastron. Cardenio memoris, kvazaŭ sonĝon, sian disputon kun don Quijote, kaj rakontis pri ĝi al la aliaj, sed tute ne povis memori la kaŭzon de tia kverelo.

Ĉe tio ili aŭdis voĉon kaj ekkonis, ke ĝi venas de Sancho, kiu, ĉar li ne trovis ilin en la loko, de kie li antaŭe foriris, laŭte ilin vokis. Ili iris renkonte al la ŝildisto, demandis lin pri don Quijote, kaj Sancho respondis, ke li trovis sian mastron nuda, nur en ĉemizo, flava, duonmortanta de malsato kaj suspiranta pri sia sinjorino Dulcinea. Sancho aldonis, ke li diris al don Quijote, ke ŝi ordonas lin forlasi tiun lokon kaj reveni al El Toboso, kie ŝi atendas lin; malgraŭ tio, lia mastro respondis, ke li faris al si la firman decidon ne aperi antaŭ ŝia beleco sen plenumi heroaĵon, kiu igos lin inda je ŝia

favoro; la ŝildisto diris ankaŭ, ke, se longiĝus nur iomete pli la stato de don Quijote, li riskus fariĝi nek imperiestro, kiel li devus, nek almenaŭ ĉefepiskopo kies posteno estis la plej humila, kiun li povus okupi; sekve, ili devus pensi, kiel forkonduki lin de tie.

La pastro respondis, ke li ne zorgu, ĉar la kavaliro vole nevole foriros kun ili. Poste li rakontis al Dorotea kaj Cardenio pri la plano, kiun li elpensis kun la barbiro por kuraci don Quijote, aŭ almenaŭ por preni lin al lia hejmo. Ĉe tio Dorotea rimarkigis, ke ŝi ludus la rolon de afliktulino pli bone ol la barbiro, des pli, ke ŝi portas kun si unu kostumon, kaj, ke, se ŝi vestus sin per ĝi, la tuta afero vidiĝus plej natura. Ŝi aldonis, ke ili povus senhezite lasi al ŝi la taskon ludi ĉion necesan por la sukcesigo de ilia plano, ĉar ŝi legis multe da libroj kavaliraj kaj sciis kian stilon uzis la afliktitaj damoj, kiam ili petis la helpon de la vagantaj kavaliroj.

—Do, ni bezonas nur meti manon al la laboro —diris la pastro—. Nedubeble la sorto sin montras favora, ĉar, neatendite, ĝi komencas lumi esperige super vi, amikoj miaj, kaj krome faciligas al ni la efektivigon de nia propra entrepreno.

Dorotea elprenis el sia sako belan kostumon el tre bonkvalita lano, ĉarman mantilon el verda ŝtofo kaj, el skatoleto, kolieron kaj kelke da juveloj. En unu momento ŝi garnis sin per ili kaj tiel transformiĝis, ke ŝi ŝajnis riĉa kaj granda sinjorino. Ŝi diris, ke ĉion ĉi, kaj iom kroman, ŝi prenis ĉe si por ĝin uzi, se bezone, kaj ke ĝis nun ne prezentiĝis la okazo. Ŝia gracio, eleganto kaj belo ĉarmis ilin, kaj ĉiuj konvinkiĝis, ke don Fernando estis vere stulta, dizertante de tia belulino. Sed ŝia plej fervora admiranto estis Sancho; ŝajnis al li, ke en sia tuta vivo li ne vidis personon tiel belan (kaj en tio li pravis), kaj kun granda insisto demandis la

pastron, kiu estas la bela sinjorino kaj kion ŝi faras en tiel aparta loko.

—Ĉi bela sinjorino, frato Sancho, estas ne ajna persono, sed la heredulino, laŭ rekta vira linio, de la granda regno de Micomicón. Ŝi serĉas vian mastron por peti de li favoron, nome, ke li venĝu ŝin por la ofendo al ŝi farita de perversa giganto. Kaj pro la famo de brava kavaliro akirita de via mastro tra la tuta konata universo, ĉi princino venis el Gvineo serĉante lin.

—Feliĉa serĉo kaj feliĉa renkonto —diris Sancho Panza—, des pli, se mia mastro havos la ŝancon ripari la ofendon al ŝi faritan, mortigante la filon de putino, la giganton, kiun via moŝto menciis. Mi estas certa, ke, se li lin trovos, li mortigos lin, escepte se la giganto estas ankaŭ fantomo, ĉar mia mastro havas nenian povon kontraŭ la fantomoj. Sed, sinjoro pastro, mi deziras peti de vi unu specialan aferon: ke, por ke mia mastro ne sentu la deziron fariĝi ĉefepiskopo, kion mi vere timas, vi konsilu lin tuj edziĝi al ĉi princino; tiel li vidos sin en la neebleco ricevi ĉefepiskopan ordinon, facile sukcesos okupi la tronon de imperio, kaj mi akiros, do, kion mi deziras. Mi bone pensis pri la afero kaj trovas, ke ne konvenas al mi, ke mia mastro fariĝu ĉefepiskopo, se konsideri, ke mi estas edzo, sekve netaŭga por la Eklezio, kaj se nun mi, havanta edzinon kaj filojn, devus klopodadi por akiri la kanonan permeson, kiu ebligus al mi la ricevon de prebendo, la klopodoj estus senfinaj. Tiel do, sinjoro, ĉio dependas de tio, ke mia mastro tuj edziĝu al ĉi sinjorino, kiun mi ne nomas per ŝia nomo, ĉar mi ĝin ne konas.

—Ŝi nomiĝas —respondis la pastro— princino Micomicona; tio evidentas, se konsideri, ke ŝia regno estas nomata Micomicón.

—Kompreneble, —diris Sancho—. Mi konas multe da homoj, kies nomojn kaj titolojn ili prenas al si el la nomoj, de la lokoj de sia naskiĝo, ekzemple, Pedro de Alcalá, Juan de Úbeda kaj Diego de Valladolid, kaj certe tie for, en Gvineo, okazas la samo, kaj la reĝinoj prenas al si la nomojn de siaj regnoj.

—Vi pravas —respondis la pastro—, kaj rilate la edziĝon de via mastro, mi faros mian plejblon.

Tiel ĝojis Sancho pro ĉi promeso, kiel miris la pastro, vidante la naivon de la ŝildisto, kaj konstatante, kiel profunde radikiĝis en lia fantazio la samaj absurdoj de lia mastro, ĉar ŝajne li serioze kredis, ke iam don Quijote fariĝos imperiestro.

Intertempe Dorotea sidiĝis sur la mulo de la pastro, la barbiro fiksis al sia vizaĝo la barbon el bova vosto, kaj ili petis la ŝildiston gvidi ilin al la loko de don Quijote. Poste ili lin avertis, ke li ne diru al sia mastro, ke li konas la pastron kaj la barbiron, ĉar la imperiestriĝo de don Quijote dependos de tio, ke ili devas resti nekonataj al li. Nek Cardenio nek la pastro volis ilin akompani: la unua, por ke don Quijote ne memoru sian disputon kun li; la pastro, ĉar lia ĉeesto ankoraŭ ne necesis.

Tiel do, dum la aliaj rajdis antaŭe, ili postiris lante surpiede. La pastro ne povis ne ripeti siajn instrukciojn al Dorotea, kaj ŝi respondis, ke li ne bezonas zorgi, kaj ke ĉio okazos tute laŭ la priskriboj kaj postuloj de la kavaliraj libroj.

Irinte iom pli ol du mejlojn, ili ekvidis, ke don Quijote, jam vestita sed sen la armaĵo, staras inter krutaj rokoj. Sancho montris lin al Dorotea, ŝi tuj donis per la vipo frapon al sia rajd-besto, kaj post ŝi ekiris ŝia barboza barbiro. Kiam ili alvenis al la kavaliro, ŝia ŝildisto saltis de sur la mulo kaj pretiĝis preni ŝin per la brakoj por helpi ŝin descendi. La

junulino deseliĝis kun senĝena gracio kaj genuis antaŭ don Quijote. La kavaliro vane penis relevigi ŝin kaj ŝi do diris surgenue:

—De ĉi tie mi ne leviĝos, ho kuraĝa kaj grandanima kavaliro, ĝis via bono kaj ĝentilo konsentos fari al mi unu favoron, kiu pligrandigus vian honoron, kaj la gloron de via persono, kaj kiu alportus rimedon al la plej senkonsola kaj ofendita pucelo sub la suno. Kaj se la kuraĝo de via forta brako respondas al via eterna renomo, vi havas la devon protekti misfortulinon, kiu, logita de la parfumo de via famo venis de tre fora lando por serĉi vin kaj peti de vi rimedon por siaj afliktoj.

—Eĉ ne vorton mi respondos, rava sinjorino, kaj nenion plian mi aŭskultos pri viaj aferoj, ĝis vi leviĝos de la grundo —diris don Quijote.

—Mi leviĝos, sinjoro —respondis la afliktita knabino—, nur kiam via ĝentilo konsentos plenumi la favoron, kiun mi petas.

—La favoron mi volonte konsentas kaj faros —respondis don Quijote—, kondiĉe, ke ĝi ne kunportos damaĝon aŭ diskrediton al mia reĝo, al mia patrio, aŭ al la damo, kiu posedas la ŝlosilon de mia koro kaj de mia libero.

—Ĝi kaŭzos nek damaĝon nek diskrediton, kara sinjoro —respondis la afliktita knabino.

Ĉe tio Sancho Panza proksimiĝis al sia mastro kaj flustris ĉe lia orelo:

—Nu, sinjoro, senhezite promesu fari la favoron petitan. Ja, temas pri bagatelo: nur mortigi gigantaĉon. Kaj la petantino estas la granda princino Micomicona, reĝino de la vasta regno Micomicón, en Etiopio.

—Kiu ajn ŝi estas —respondis don Quijote—, mi faros kion mia devo kaj konscienco diktas, en obeo al la reguloj de mia profesio.

Kaj, sin turninte al la knabino, li aldonis:

—Leviĝu, ĉarma sinjorino; mi plenumos kiun ajn favoron vi petos de mi.

—Kion mi petas de via grandanimeco —respondis la knabino — estas, ke vi akompanu min tuj al la loko, kien mi vin kondukos, kaj ke vi promesu ne entrepreni alian aventuron aŭ taskon, antaŭ ol vi venĝos min kontraŭ perfidulo, kiu uzurpis mian regnon spite al ĉiaj leĝoj diaj kaj homaj.

—Mi ripetas, ke mi konsentas al vi la favoron —respondis don Quijote—, sekve, jam de hodiaŭ vi povas formeti de vi la melankolion, kies pezo vin premegas, kaj reanimi vian feblan esperon per nova forto kaj energio. Kun la helpo de Dio kaj de mia brako, baldaŭ vi rekiros vian regnon kaj sidos en la trono de via granda kaj antikva lando, spite al la friponoj kiuj volus oponi al vi. Ni metu do manon al la laboro, ĉar, kiel oni diras, en prokrasto sidas danĝero.

La afliktita damo persiste penis kisi al li la manojn, sed don Quijote, en ĉio ĝentila kaj bonmaniera kavaliro, tute ne toleris tion. Kontraŭe, li igis ŝin leviĝi, brakumis ŝin plej ĝentile kaj bonmaniere kaj ordonis la ŝildiston ĝustigi la ventrozonon de Rocinante kaj armi lin tuj poste. Sancho dekroĉis la armaĵo-pecojn de arbo, de kie ili pendis kvazaŭ trofeoj kaj, ĝustiginte la ventrozonon, li armis en unu momento sian mastron, kiu, vidante sin preta, diris:

—Je la nomo de Dio, ni jam ekiru helpi ĉi grandan sinjorinon.

La barbiro, ankoraŭ sur siaj genuoj, tre atentis ne ridi kaj ne lasi sian barbon defali, alie, ili eble ne povus sukcesigi sian

bonan intencon. Sed la barbiro, vidante ke don Quijote konsentis la favoron kaj rapide sin preparis por ĝin plenumi, prenis unu manon de ŝia mastrino, don Quijote la alian, kaj ambaŭ helpis ŝin sidiĝi sur la mulo. Poste don Quijote saltis sur Rocinante, la barbiro sin aranĝis sur sia rajd-besto, kaj Sancho sekvis ilin piede, kio renovigis en li la doloron pro la perdo de lia azeno, kies mankon li tre sentis en tiu momento; tamen li ĝoje elportis ĉion, pensante, ke lia sinjoro iras sur la vojo fariĝi tre baldaŭ imperiestro, ĉar sendube li edziĝos al la princino kaj oficos almenaŭ kiel reĝo de Micomicón. Nur unu afero kaŭzis al li zorgon, nome, ke tiu regno troviĝis en lando de negroj, kaj, ke, sekve, la subuloj, kiujn oni sendube donus al li, estus nigraj; sed al tio li trovis en sia fantazio bonan rimedon.

—Kio min tuŝas, se miaj subuloj estas nigraj? Mi devos nur enŝipigi kaj transporti ilin al Hispanujo; ĉi tie mi povos vendi ilin kontante kaj, per la mono de la vendo, aĉeti titolon aŭ oficon ebligontan al mi senzorge pasi la reston de mia vivo. Nur mankus, ke mi preterus la okazon kaj ne havus talenton kaj lerton sufiĉan por fari belan aranĝon kaj vendi en la daŭro de palpebrumo tridek, aŭ tridek mil, subulojn... Je Dio, mi forvendos ilin bloke, la grandajn kun la etaj, aŭ kiel ajn mi povos, kaj eĉ se ili estos nigregaj, mi scios igi ilin blankaj kaj flavaj.^[125] Ho ne, mi ne havas herbon en la cerbo...

Ĉi agrablaj pensoj tiel kontentigis kaj animis lin, ke li forgesis la ĉagrenon iri surpiede. Dume, Cardenio kaj la pastro, kaŝitaj inter veproj, observis ĉion ĉi kaj ne sciis kion fari por kuniĝi al la grupo. Sed la pastro, kies inĝenio estis tre granda, elpensis planon adekvatan: per la tondilo, kiun li portis en skatolo, li rapide fortondis la barbon de Cardenio, poste surmetis al li sian propran grizan sajon kaj sian nigran manteleton, kaj restis nur en ĉemizo kaj kalsono. La aspekto de Cardenio, tiel transformiĝis per tio ke li mem ne rekonus sin, se li rigardus sin en spegulo. Poste, kvankam la grupo

antaŭiĝis dum ili sin alivestis, Cardenio kaj la pastro facile alvenis unuaj al la ĉefvojo, ĉar la veproj kaj la kruta grundo ne permesis la brutojn movi sin tiel rapide kiel la piedirantoj. Elirinte el la montaro, la du viroj haltis en apuda ebenaĵo, kaj, tuj post kiam don Quijote kaj liaj gekamaradoj elrajdis, la pastro fiksas sur lin la rigardon, ŝanĝante samtempe sian esprimon, kvazaŭ li rekonas iom post iom la kavaliron. Fine, li kuris al li, apertante la brakojn kaj kriante:

—Kia feliĉa renkonto, ho mia bona samlandano don Quijote de La Mancha, spegulo de la kavalirismo, floro kaj kremo de la kuraĝo, protektanto de la mizeruloj, kvintesenco de la vagantaj kavaliroj!

Dum li parolis, li ĉirkaŭprenadis la livan genuon de don Quijote, kiu, konfuzita de tio, kion la alia diris kaj faris, rigardis lin atente, fine lin rekonis kaj, kvazaŭ konsternita de lia ĉeesto, energie penis deseliĝi; ĉar la pastro oponis al tio, don Quijote diris:

—Sinjoro licenciulo, permesu min. Mi ne rajtas rajdi, dum tiel respektinda persono kiel via moŝto iras piede.

—Neniel mi tion konsentos —respondis la pastro—. Via Grandeco iru sur la ĉevalo, ĉar vi plenumas rajde la plej eksterordinarajn farojn kaj aventurojn de nia epoko. Mi estas nur nedigna pastro kaj sufiĉos al mi sidi sur la malantaŭo de unu el la muloj de ĉi sinjoroj, se tio ne ĝenos ilin. Kaj mi eĉ imagos, ke mi rajdas sur la ĉevalo Pegazo, aŭ sur la zebro aŭ stalono de la fama maŭro Muzaraque, kiu ĝis nun kuŝas ensorĉita en la monto Zulema, ne for de la granda Compluto.

—Mi ne pensis pri tio, sinjoro licenciulo —respondis don Quijote—, sed mi scias, ke mia sinjorino la princino bonvolos fari al mi la favoron ordoni al sia ŝildisto cedi al vi la selon de sia mulo, ĉar li povos sidi sur la grupo, se la besto eltenos.

—Jes, mi opinias, ke ĝi eltenos —diris la princino—, kaj mi opinias ankaŭ, ke ne necesas ordoni al mia ŝildisto, ĉar li estas tiel ĝentila kaj bonedukita, ke li ne konsentos, ke iru piede ekleziulo, kiu povas rajdi.

—Certe! —respondis la barbiro.

Li tuj saltis de la mulo kaj invitis la pastron okupi la selon, kion tiu faris sen ke oni bezonus ripeti la inviton. La mavo de la afero kuŝis en tio, ke la mulo, lu-besto kaj sekve malica, iom levis la postajn krurojn kaj ellasis du kalcitrojn tiajn, ke se ili estus trafintaj la bruston aŭ la kapon de majstro Nicolás, li certe sendus al la diablo sian serĉon de don Quijote. Tamen, pro la subita ekskuiĝo de la mulo, li renversiĝis sur la grundon, kun tiel eta atento al sia barbo, ke ĝi defalis. Vidante sin sen la barbo, li ne havis alian rimedon ol kovri al si la vizaĝon kaj diri plende, ke liaj dentoj rompiĝis. Kiam don Quijote rimarkis la mason da barbo, kiu kuŝis sen sango kaj makzeloj kelkan distancon de la vizaĝo de la falinta ŝildisto, li diris:

—Je Dio, vere granda miraklo! La barbo deŝiriĝis kaj falis de la vizaĝo kvazaŭ memvole!

La pastro, vidante ke lia plano riskas esti malkovrita, kuris tuj al la barbo, prenis ĝin, iris al la loko, kie la kuŝanta majstro Nicolás laŭte plendis ankoraŭ, subtenis lian kapon, ĝin premis al sia brusto kaj en unu momento fiksas denove la barbon, flustrante kelke da vortoj, kiuj, laŭ li, konsistigis magian formulon por la refikso de barboj, kiel ili vidos. Firme alliginte la barbon, la pastro iris flanken, kaj la ŝildisto vidiĝis tiel barboza kaj sana kiel antaŭe. Ĉe tio don Quijote profunde miris kaj petis la pastron konigi al li la magian formulon, kiam li povus, ĉar li havis la konvinkon, ke ĝia efiko etendiĝas preter la nura fikso de barboj, se konsideri, ke la karno de kie oni deŝiras barbon, ĉiam aperas sanga kaj

leza, kaj ke, se la formulo kaŭzas kompletan resanigon, kiel vidite, certe ĝi devas utili por multaj aliaj kazoj, krom la barbaj.

—Vi pravas —respondis la pastro, kaj promesis al don Quijote konigi al li la formulon en la unua oportuna okazo.

Oni akordis, ke la pastro rajdu la unua, kaj ke aliaj tri alternu sur la sama mulo ĝis la alveno al la gastejo, staranta ses mejlojn for. Tri el ili iris do rajde: don Quijote, la princino kaj la pastro; kaj tri, piede: Cardenio, la barbiro kaj Sancho Panza. Tiam la kavaliro diris al la knabino:

—Via Alteco, sinjorino, gvidu nin, kien vi deziras iri.

Sed antaŭ ol ŝi respondus, intervenis la pastro:

—Al kiu regno gvidos nin via moŝto? Ĉu al Micomicón? Sendube ni iros tien, aŭ mi scias nenion pri regnoj.

Dorotea, tre rapid-pensa, komprenis, ke ŝi devas jese respondi, do ŝi diris:

—Jes, sinjoro, tien kondukas la vojo.

—Se tiel —diris la pastro—, ni devos pasi tra mia vilaĝo; de tie, via moŝto prenu la vojon al Cartagena, kie, kun bona sorto, vi povos enŝipiĝi. Proksimume naŭ jarojn poste, se vi havos favoran venton kaj serenajn marojn, vi ekvidos la grandan lagon Meona^[126] (mi volas diri Meótides), de kie oni alvenas al la regno de Via Alteco post vojaĝo de pli ol cent tagoj.

—Vi eraras, sinjoro —ŝi diris—, ĉar, antaŭ iom malpli ol du jaroj, mi ekiris de tie, kaj, malgraŭ ke la vetero aĉis dum la tuta vojo, mi alvenis kaj havis la sorton renkonti la personon, kiun mi varme deziris vidi: la sinjoron don Quijote de La

Mancha, kies renomo trafis mian orelon, tuj kiam mi metis la piedojn en Hispanujo. Lia famo movis min iri lin serĉi por rekomendi min al lia ĝentilo kaj por konfidi mian justan aferon al la kuraĝo de lia forta brako.

—Sufiĉas —interrompis don Quijote—. Viaj laŭdoj ĉesu, ĉar mi kontraŭas al ĉia flatado; kaj, kvankam viaj ĵusaj diroj ne estas flataj, ankaŭ ili ĝenas mian ĉastan orelon. Kiom mi povas diri, sinjorino, estas, ke, kuraĝa aŭ ne, mi metos je via servo mian grandan aŭ etan kuraĝon, eĉ ĝis perdo de la vivo. Sed nun ni lasu tion. Sinjoro pastro, bonvolu diri al mi kio kondukis vin al ĉi loko, kie vi vidiĝas sola, sen ia servisto kaj en tiel terure leĝera vesto.

—Al tio mi respondos koncize —diris la pastro—. Sciu, sinjoro don Quijote, ke mi kaj majstro Nicolás, nia amiko kaj barbiro, estis survoje al Sevilla por ricevi monon senditan al mi de parenco mia jam de longe irinta al Indioj; temis pri beleta sumo: pli ol sepdek mil arĝentaj pesoj, kio estas ne malbone. Nu, kiam ni pasis hieraŭ tra ĉi lokoj, kvar banditoj nin atakis kaj rabis de ni eĉ la barbojn, tiel, ke la barbiro opiniis konvene meti al si la barbon falsan. Kaj rilate ĉi junulon —kaj li montris Cardenion— ili bele aranĝis lin! Atentindas, ke laŭ publikaj onidiroj en la regiono, la homoj nin atakintaj estas galeruloj, kiujn deĉenigis, preskaŭ en ĉi sama loko, viro laŭdire tiel kuraĝa, ke li ellasis ilin spite al la komisaroj kaj la gardistoj; sendube mankas al li klapo en la kapo, aŭ temas pri tiel eksterordinara fripono kiel la galeruloj mem, aŭ pri viro sen koro kaj konscienco, ĉar li ellasis la lupon inter ŝafinoj, la vulpon inter kokinoj, la muŝon inter mielo; li defraŭdis la justicon kaj ribelis kontraŭ sia reĝo kaj natura sinjoro, ĉar li rompis lian leĝan aŭtoritaton. Li rabis de la galeroj ties piedojn,^[127] se tiel diri, kaj metis la alarmon en la Santa Hermandad, kiu jam de multaj jaroj ripozis. Resume, lia faro kaŭzis la perdiĝon de lia animo, sen havigi profiton al lia korpo.

Jam antaŭe Sancho rakontis al la pastro kaj la barbiro la aventuron de la galeruloj, kiun lia mastro tiel glorie plenumis; kaj la pastro aludis pri la afero tiel insiste, por vidi kion farus aŭ dirus don Quijote. La koloro de la kavaliro ŝanĝiĝis je ĉiu vorto, kaj li ne kuraĝis deklari, ke li estas la liberiginto de tiuj bonuloj.

—Ili nin prirabis —finis la pastro—. Dio, en sia mizerikordo, pardonu la vivon, kiu ne lasis, ke ili ricevu sian merititan punon.

[124] «Frato», epiteto kun disdegna nuanco, kiam oni ĝin uzas por alparoli nekonatan mizerulon aŭ almozpetanton.

[125] Tio estas, ilin vendos por moneroj arĝentaj kaj oraj.

[126] Hispane, «pisulino».

[127] Ĉar la galeruloj, per la remiloj, irigis la ŝipon.

Ĉapitro 30

Pri la inĝenia procedo uzita por deturni nian enamiĝintan kavaliron de la rigora pentofaro, kiun li trudis al si

Apenaŭ ĉesis paroli la pastro, Sancho diris:

—Je mia fido, sinjoro licenciulo, mia mastro tion faris, kvankam ne mankis admonoj de mia flanko, ke li devus bone konsideri sian intencon, kaj ke li pekus, se li liberigus la ĉenulojn, ĉar oni kondukis ilin survoje al la galeroj pro iliaj multegaj friponaĵoj.

—Idioto! —interrompis lin don Quijote—. Ne estas devo aŭ koncerno de vaganta kavaliro esplori, ĉu la homoj afliktitaj, kaptitaj kaj ĉenitaj, kiujn li trovas sur la vojo, vidiĝas tiel pro iliaj krimoj aŭ pro iliaj misfortunoj; lia sola tasko konsistas en tio, helpi ilin, konsiderante ne iliajn misfarojn, sed nur ilian suferon. Mi renkontis veran rozarion da viroj mornaj kaj mizeraj kaj kondukis al ili, kiel mia religio preskribas. Ĉio cetera ne gravas. Kaj se iu obĵetas (oni esceptu la sanktan honorindon de la honesta persono de la sinjoro licenciulo) mi diras, ke li scias nenion pri la aferoj kavaliraj, ke li mensogas kiel bastardo kaj filo de putino, kaj ke mi konigos tion al li pli klare per la klingo de mia glavo.

Tion dirante, li plifirmiĝis sur la piedingoj kaj mallevis la vizieron de sia kasko, ĉar la barbo-pelvon, kiun li prenis por la helmo de Mambrino, li pendigis siatempe de la fronta sel-arko de Rocinante en atendo de la okazo riparigi la difektojn al ĝi kaŭzitajn de la galeruloj.

Dorotea, sprita kaj inteligenta, jam rimarkis la frenezon de don Quijote, kaj observante, ke ĉiuj, krom Sancho Panza, mokas lin, deziris mem partopreni en la amuzo, kaj diris ĉe lia kolero:

—Sinjoro kavaliro, memoru, ke, laŭ via promeso, vi ne povus interveni en alian aventuron, eĉ se ĝi estus plej urĝa. La brusto de via moŝto trankviliĝu, ĉar, se la sinjoro licenciulo sciintus, ke via nevenkebla brako liberigis la galerulojn, li kunkudrus al si la lipojn per tri steboj, kaj eĉ tri fojojn mordus al si la langon, antaŭ ol li dirus eĉ unu solan vorton ofendan al via moŝto.

—Mi ĵuras, ke mi tion vere farintus —diris la pastro—, kaj krome, eĉ parton de la lipharoj mi deŝirus al mi.

—Sinjorino, mi silentos, kaj detenos la justan koleron jam leviĝintan en mia brusto —diris don Quijote—. Pace kaj kviete mi kondutos ĝis mi plenumos mian promeson; sed, page por ĉi decido mia, bonvolu diri al mi, se ne estas al vi ĝene, pri la naturo de via misfortuno kaj pri la personoj, kontraŭ kiuj mi devas venĝi vin kontentige, juste kaj plene.

—Volonte mi tion faros, se vi ne enuos, aŭskultante tristaĵojn kaj misfortunojn —respondis Dorotea.

—Ne, sinjorino, mi ne enuos —diris don Quijote.

—Tiel do, viaj moŝtoj aŭskultu min atente.

Apenaŭ ŝi diris tion, Cardenio kaj la barbiro, scivolaj vidi kiel la sprita Dorotea inventos sian historion, proksimiĝis al ŝi. Ankaŭ Sancho, tiel trompita pri ŝi, kiel lia mastro, faris la samon. La junulino sin komforte aranĝis sur la selo, preparis sin paroli per ektusoj kaj aliaj gestoj kaj komencis diri kun granda sprito:

—Sciu unue, sinjoroj, ke mi nomiĝas...

Tiam ŝi haltis momenton, ĉar ŝi forgesis la nomon, kiun la pastro donis al ŝi; sed li, komprenante la kaŭzon de ŝia hezito, helpe intervenis:

—Ne strange, sinjorino, ke Via Grandeco sentas konfuzon kaj embarason, rakontante vian misfortunon; tiaj sortobatoj ofte nebuligas tiel dense la memoron de la kompatinda persono, kiu devas ilin travivi, ke li eĉ ne memoras sian propran nomon, kiel okazas al via moŝto, kiam vi forgesas, ke vi nomiĝas princino Micomicona, leĝa heredantino de la granda regno Micomicón. Nun, post ĉi precizigo Via Grandeco povos facile trovi en via damaĝita memoro ĉion, kion vi bonvolos rakonti al ni.

—Vi pravas —respondis la junulino—, kaj mi pensas, ke, de nun, mi ne bezonos aliajn atentigojn por bone rakonti ĝis la fino mian veran historion. Sciu do, ke mia patro, reĝo Tinacrio la Saĝa, eminentis en la tiel nomata magia arto kaj antaŭvidis per ĝi, ke mia patrino, reĝino Jaramilla, mortos antaŭ ol li, ke iom poste ankaŭ li mortos, kaj ke mi do restos orfa. Sed li diris, ke eĉ pli multe lin afliktas lia certeco, ke la mastro de granda insulo najbara al nia regno, iu monstra giganto nomata Pandafilando la Straba (ĉar, kvankam liaj okuloj estas normalaj kaj sidas en sia propra pozicio, li ĉiam strabas, kaŭze de sia malico, por meti timon kaj teruron en la koron de la homoj, kiam li ilin rigardas), nu, tiu giganto, laŭ la diro de mia patro, invadus mian regnon, kiam li sciis pri mia orfeco, ĉion rabus de mi kaj ne lasus al mi eĉ unu vilaĝeton, kie mi povus vivi; mia patro la reĝo aldonis, ke tian ruinon kaj misfortunon mi evitus, se mi edziniĝus al la giganto, sed mia patro pensis ankaŭ, ke mi neniam konsentus tiel misproporcian pariĝon; kaj li pravis, ĉar tute ne venis al mi en la kapon la ideo edziniĝi al li aŭ al alia giganto, kiom ajn enorma kaj monstra li estus. Mia patro

aldonis, ke, post lia morto, kiam mi vidus Pandafilandon penetri en mian regnon, mi devus ne fronti lin, ĉar tio estus mia ruino, sed lasi lin libere okupi la tutan landon, kaj tiel mi evitus la morton kaj plenan detruon de miaj karaj kaj lojalaj regnantoj, se konsideri, ke mi ne povus starigi sukcesan reziston kontraŭ la infera forto de la giganto. Anstataŭe, en la akompano de kelkaj fideluloj, mi devus direkti min al Hispanujo, kie mi trovus rimedon por miaj misfortunoj en la persono de vaganta kavaliro, kies famo tiutempe jam vastiĝus tra la tuta regno, kaj kies nomo, se mi bone memoras, estus don Azote aŭ don Jigote.

—Li certe diris don Quijote, sinjorino —interrompis Sancho—, alinome la Kavaliro de la Trista Mieno.

—Efektive —respondis Dorotea—. Li diris ankaŭ, ke li estus altakreska kaj kavavizaĝa, kaj ke sur lia dekstra korpoflanko, proksimume sub la liva ŝultro, vidiĝus bruna belgrajno kun kelkaj haroj dikaj kiel krinoj.

Aŭdinte tion, don Quijote diris al la ŝildisto:

—Nu, Sancho, min helpu senvestigi min. Mi volas konstati, ĉu mi estas la kavaliro profetita de tiu saĝa reĝo.

—Kial via moŝto volas sin nudigi? —demandis Dorotea.

—Ĉar mi deziras vidi, ĉu mi havas sur mi la belgrajnon menciitan de via patro —respondis don Quijote.

—Ne necesas, ke vi senvestiĝu —diris Sancho—. Mi scias, ke via moŝto havas meze de la spino tiuspecan belgrajnon, kio estas signo de forto.

—Tio sufiĉas —diris Dorotea—. Inter amikoj, oni ne zorgu pri bagateloj; tute ne gravas do, ĉu la belgrajno sidas sur la spino aŭ sub la ŝultro; sufiĉas, ke ĝi ekzistas ie ajn sur li, ja

temas pri la sama karno. Sendube mia patro ĉion ĝuste antaŭdiris, kaj mi bone agis konfidante min al sinjoro don Quijote, ĉar li estas la persono anoncita de mia patro, kion pruvas la aspekto de lia vizaĝo kaj tio, ke li famas ne nur en Hispanujo, sed eĉ tra la tuta La Mancha. Efektive, tuj kiam mi elŝipiĝis en Osuna, mi aŭdis rakonti tiom da faroj liaj, ke mia koro tuj diris al mi, ke li estas la sama, kiun mi venis serĉi.

—Kiel povis Via Grandeco elŝipiĝi en Osuna? —demandis don Quijote—. Ĝi ja ne sidas ĉe la maro.

Antaŭ ol Dorotea povus respondi, la pastro intervenis:

—La sinjorino princino certe volis diri, ke, elŝipiĝinte en Málaga, ŝi aŭdis paroli pri vi la unuan fojon en Osuna.

—Jes, tion mi volis diri —deklaris Dorotea.

—Sendube —diris la pastro—. Via reĝina moŝto bonvolu daŭrigi vian rakonton.

—Mi jam diris ĉion, krom ke, bonŝance, mi trovis sinjoron don Quijote kaj sekve jam konsideras min reĝino kaj sinjorino de mia tuta lando. Pro sia ĝentilo kaj sindono li konsentis al mi la favoron sekvi min, kien ajn mi lin kondukos, rekte do ĝis Pandafilando la Straba, por ke li mortigu lin kaj redonu al mi kion la giganto tute senrajte uzurpis. Ĉio ĉi okazos laŭlitere, konforme al la profetaĵoj de mia bona patro Tinacrio la Saĝa, kiu diris kaj skribis ankaŭ per literoj grekaj aŭ ĥaldeaj (mi ne distingas la diferencon inter ili), ke, se la kavaliro de la profetaĵoj volus edziĝi al mi, tratranĉinte la gorĝon de la giganto, mi devus senproteste akcepti lin kiel leĝan edzon kaj cedi al li mian regnon kune kun mia persono.

—Kion vi opinias, amiko Sancho? —diris don Quijote—. Ĉu vi ne aŭdis? Ĉu mi ne anoncis al vi la samon?^[128] Jen, ni jam havas landon por regi kaj reĝinon por edziĝi.

—Grandioze! —diris Sancho—. La diablo prenu la bastardon, kiu ne edziĝus al ŝi, dishakinte la glutilon de sinjoro Pandahilado. Tiel frandinda reĝino! La puloj de mia lito fariĝu similaj al ŝi!

Tion dirinte, li faris du kapriolojn en aero, en monstro de ega kontento; poste li iris al la besto de Dorotea, prenis ĝian bridon, genuiĝis antaŭ ŝi kaj petis ŝian permeson por kisi ŝiajn manojn en signo de tio, ke li rigardas ŝin kiel sian reĝinon kaj sinjorinon. Kiu, inter la ĉeestantoj, povus ne ridi, vidante la frenezon de la mastro kaj la naivon de la servisto? Nu, Dorotea etendis siajn manojn al Sancho kaj promesis fari lin grandsinjoro se, pro graco de la ĉielo, ŝi denove akirus kaj ĝuus sian regnon. Sancho dankegis ŝin per tiaj vortoj, ke la ĉeestantoj refoje eksplodis per ridoj.

—Tia, sinjoroj, estas mia historio —daŭrigis Dorotea—. Mi devas ankoraŭ diri al vi, ke el la personoj min akompanintaj de mia regno, restas al mi nur ĉi bona ŝildisto longabarba, ĉar la aliaj dronis en granda ŝtormo, kiu nin trafis proksime al la haveno; mi kaj li kvazaŭ mirakle albordiĝis sur du tabuloj; cetere vi jam sendube rimarkis, ke ĉio aperas mirakla kaj mistera laŭlonge de mia vivo. Kaj se mi troigis aŭ misprezentis ion, ne forgesu la diron de la sinjoro licenciulo ĉe la komenco de mia rakonto, ke suferante pro eksterordinaraj kaj senĉesaj misfortunoj, oni parte perdas la memoron.

—Mi ĝin ne perdos, ho moŝta kaj kuraĝa sinjorino, kiom ajn grandaj kaj unikaj estos la klopodoj, kiujn mi faros je via servo —diris don Quijote—. Tiel do, unu plian fojon mi konfirmas mian promeson al vi, kaj ĵuras iri kun vi eĉ al la

fino de la mondo, ĝis mi frontos vian ferocan malamikon, kies orgojlan kapon mi dehakos, kun la helpo de Dio kaj de mia brako, per la klingo de ĉi glavo... mi ne volas nomi ĝin bona, ĉar la mian forprenis Ginés de Pasamonte...

Ĉi lastajn vortojn li tradentis, kaj poste daŭrigis:

—Kiam mi senkapigos la giganton kaj remetos vian landon en vian pacan posedon, vi povos fari laŭplaĉe kun via persono, ĉar, dum mi havos la memoron okupata, la volon kaptita kaj la menson absorbita de la... nu, ne necesas plu diri... ne eblos al mi eĉ pensi pri edziĝo, eĉ se temus pri edziĝo al la fenikso mem.^[129]

Sancho ricevis tiel grandan ŝokon, kiam lia mastro manifestis sian rifuzon edziĝi, ke li diris furioze, levante la voĉon:

—Je Dio, sinjoro don Quijote! Certe vi perdis la kandelon el la kapo, ĉar alie vi ne hezitus edziĝi al tiel moŝta princino. Ĉu vi pensas, ke Fortuno proponos al vi similan ŝancon ĉe ĉiu turno de la vojo? Ĉu sinjorino Dulcinea pli belas? Certe ne, ŝi posedas eĉ ne la duonon de la belo de la princino, kaj mi devus aldoni, ke Dulcinea havas apenaŭ meriton sufiĉan por laĉi la ŝuojn de ĉi damo. En la tago de Sankta Neniamo mi ricevos mian grafolandon, se via moŝto kapricas serĉi trufojn en la fundo de la maro. Nu, bonvolu, edziĝu tuj al ŝi, je la diablo, prenu ĉi regnon, kiu falas al vi en la manojn kiel matura frukto, kaj, kiam vi reĝos, faru min markizo aŭ gubernatoro, kaj ĉio cetera iru al la infero!

Don Quijote, aŭdinte tian blasfemadon kontraŭ sia sinjorino Dulcinea, ne povis plu elteni, levis la lancon kaj, sen vorto aŭ averto, ellasis al li sur la dorson du batojn tiel fortajn, ke Sancho falis teren. Kaj sendube tial, ke Dorotea laŭte petis la

kavaliron halti, don Quijote ne prenis de li la vivon en tiu momento.

—Ĉu vi pensas, fava hundo —diris iom poste don Quijote—, ke vi ĉiam povos impertinenti al mi, kaj ke ni ne havas alion por fari, krom mokado de via flanko kaj pardonado de la mia? Nu, ne pensu tiel, fripono ekskomunikita: tio certe vi estas, ĉar vi kalumniis la senkomparan Dulcinea. Ĉu vi ne scias, kanajlo kot-anima, ke sen la forto, kiun ŝi transmetas al mia brako, mi ne havus kuraĝon eĉ por mortigi unu solan pulon? Diru, viper-langa mokanto: kiu do, laŭ vi, konkeris ĉi regnon, dehakis la kapon de ĉi giganto kaj faris vin markizo (ĉar mi jam rigardas ĉion ĉi kiel aferon fakte plenumitan), se ne Dulcinea, kies kuraĝo uzas mian brakon kiel instrumenton de ŝiaj faroj? Ŝi batalas kaj venkas en mi, mi vivas kaj spiras en ŝi, kaj en ŝi mi havas ekziston kaj estadon. Ho mizera bastardo, kiel sendanke vi kondutas! Vi vidas vin levita de sur la polvo de la tero al la rango de titolita grandsinjoro kaj reciprokas tiel grandan favoron, dirante mavon pri via favorantino.

Sancho kuŝis disbatita, sed ne tiom, ke li ne povus aŭdi la riproĉojn de sia mastro. Li stariĝis rapide, iris post la ĉevalon de Dorotea kaj de tie diris al don Quijote:

—Nu, sinjoro, se vi firme decidis ne edziĝi al ĉi granda princino, evidentas, ke la regno ne estos via, kaj sekve vi ne povos doni al mi ian rekompencan. Pro tio mi plendas. Sinjoro, edziĝu al ĉi reĝino per unu fojo, nun, kiam ni havas ŝin ĉi tie, kvazaŭ ŝi estus falinta de la ĉielo, kaj poste vi povos iri al sinjorino Dulcinea, konsiderante, ke en la mondo certe ne mankis reĝoj kun konkubinoj. Pri la afero de la beleco mi ne opinias: se diri la veron, la du ŝajnas al mi ĉarmaj, kvankam mi neniam vidis sinjorinon Dulcinea.

—Kion, perfida blasfemanto! Ĉu vi ne vidis ŝin? —ekkriis don Quijote. —Ĉu vi ne alportis ĵus al mi mesaĝon de ŝia flanko?

—Mi volis diri, ke mi ne vidis ŝin sufiĉe longe por observi la belon de ŝiaj ĉarmaj trajtoj, unu post la alia; sed kiel tuto ŝi ŝajnas al mi bone.

—Nun mi komprenas —diris don Quijote—. Kaj pardonu, ke mi vin insultis, ĉar ne estas en la povo de la homoj detentis unuan impulson.

—Efektive, sinjoro —respondis Sancho—. Mia unua impulso ĉiam puŝas min paroli; kaj mi ne povas ne diri tion, kio ĉiufoje venas al mia lango.

—Tamen, atentu, kiam vi parolas, Sancho —diris don Quijote—, ĉar longe ĉerpas la kruĉo ĝis ĝi rompiĝas...

—Nu, bone —respondis Sancho—. Dio vidas de la ĉielo ĉies mankojn kaj juĝos, ĉu mi per miaj vortoj kondukis pli riproĉinde ol vi per viaj agoj.

—Sufiĉe jam —diris Dorotea—. Rapidu, Sancho, kisi la manon kaj peti la pardonon de via sinjoro; de nun estu pli modera rilate al viaj laŭdoj kaj kritikoj, ne diru mavon pri sinjorino Tobosa, kiun mi deziras koni kaj servi, kaj havu fidon je Dio: certe ne mankos al vi ia ŝtato, kie vi vivos kiel princo.

Sancho proksimiĝis kapkline al sia mastro kaj petis ties manon. Don Quijote ĝin etendis kun solena mieno kaj, post ol la ŝildisto ĝin kisis, donis al li sian benon kaj petis lin proksimiĝi iom pli por fari al li kelkajn demandojn kaj trakti aferojn tre gravajn. Sancho obeis kaj, kiam li antaŭiĝis ioman distancon de la aliaj, diris don Quijote:

—De kiam vi venis, mi ne havis okazon aŭ tempon por detale demandi al vi pri la mesaĝo, kiun vi portis, kaj pri la respondo, kiun vi ricevis; kaj ĉar nun la sorto donas al ni tempon kaj okazon, ne rifuzu al mi la plezuron aŭskulti viajn bonajn novaĵojn.

—Via moŝto demandu laŭvole —diris Sancho— kaj mi tuj havos preta la respondon. Sed mi petas vin, sinjoro, ne estu tiel venĝema en la futuro.

—Kial vi diras tion, Sancho? —demandis don Quijote.

—Ĉar la batoj, kiujn vi ĵus donis al mi, pli ŝuldiĝas al la disputo okazinta inter ni antaŭ kelke da noktoj^[130] pro instigo de la diablo, ol al miaj diroj kontraŭ sinjorino Dulcinea, kies personon, cetere, mi amas kaj kultas kiel relikvon, eĉ se ŝi ne estas tio, pro la fakto, ke ŝi apartenas al via moŝto.

—Je via vivo, Sancho, ne komencu trakti denove la saman aferon; ne ĉagrenu min —diris don Quijote—. Mi jam pardonis vin tiam, kaj cetere vi tre bone konas la proverbon: «Por nova peko, nova pentofaro».

Ĉe tio ili vidis alrajdi sur la sama vojo viron sur azeno kaj, kiam li proksimiĝis, li ŝajnis al ili cigano. Sed Sancho, kies koro kaj okuloj ĉiam sin tiris al ajna azeno, kiun li vidis, tuj rekonis en la viro la galerulon Ginés de Pasamonte, kaj per la fadeno de la cigano li trafis en la bobenon de sia azeno, ĉar efektive ĝi estis la lia. Pasamonte, por kaŝi sian identecon kaj por vendi la azenon, iris en cigana kostumo tial, ke la cigana, kiel multaj aliaj lingvoj, estis al li tiel familiara kiel la propra. Nu, Sancho apenaŭ vidis kaj rekonis lin, diris al li per laŭtegaj voĉoj:

—Hej, Ginesillo, latrono! Lasu mian trezoron, redonu al mi la vivon kaj la konsolon! Lasu la azenon! Fuĝu, bastardo, for de ĉi tie, kanajlo, lasu la predon!

Ne necesis tiom da vortoj kaj insultoj, ĉar, ĉe la unua voĉo, Ginés desaltis al la tero, ekpelis la piedojn en fuĝa hasto kaj perdiĝis el la vido en la daŭro de palpebrumo. Sancho kuris al sia azeno, ĝin brakumis kaj diris al ĝi:

—Kiel vi fartas, trezoro, lumo de miaj okuloj, kompano mia?

Li kisis kaj karesis la beston kvazaŭ ian personon, kaj la azeno, muta, lasis sin kisi kaj karesi sen respondi eĉ unu vorton.

La tuta grupo proksimiĝis kaj gratulis Sanchon pro tio, ke li retrovis la azenon. Don Quijote speciale lin gratulis kaj aldonis, ke li tenas ĉiuokaze valida sian promeson transdoni al li la tri azenidojn. Sancho lin dankis kaj, dum ili du tiel babilis, la pastro gratulis Dorotean pro la sprito kaj koncizo de ŝia rakonto kaj pro tio, ke ĝi tiel multe similas al la historioj de la kavaliraj libroj. Ŝi respondis, ke ŝi ofte sin distris legante tiujn librojn, sed ke ŝi ne scias, kie situas la provincoj kaj la maraj urboj, kaj ke pro tio ŝi trafe maltrafe indikis, ke ŝi elŝipiĝis en Osuna.

—Tion mi rimarkis —diris la pastro—, sekve mi intervenis por ripari vian eraron. Ĉu ne estas mirinde, ke ĉi kompatinda hidalgo tiel facile kredas tiajn mensogojn kaj fantaziojn, nur ĉar ili similas en stilo kaj esenco al la ekstravagancoj de liaj libroj?

—Efektive —respondis Cardenio—. Tiel rara kaj unika estas lia frenezo, ke mi ne scias, ĉu ekzistas homa genio kapabla ĝin elpensi kaj doni al ĝi literaturan formon.

—Menciindas ankoraŭ alia strangaĵo —diris la pastro—. Se oni parolas al ĉi bona hidalgo pri io ajn ne tuŝanta lian frenezon, li ne nur ne diras stultaĵojn, sed eĉ saĝe sin esprimas kaj montras klaran kaj serenon komprenon, tiel, ke se oni nur ne perturbus lin per temoj kavaliraj, la tuta mondo juĝus, ke li havas sanan menson.

Dum ili sin okupis per ĉi babilado, don Quijote, daŭrigante la sian, diris al Sancho:

—Amiko Sancho, la aferon de niaj kvereloj ni formetu en la keston de forgeso, kaj sen ia rankoro aŭ kolero de via flanko diru nun al mi kie, kiel kaj kiam vi renkontis Dulcinean. Kion ŝi faris? Kion vi diris al ŝi? Kion ŝi respondis? Kiel aspektis ŝia vizaĝo, dum ŝi legis mian leteron? Kiu ĝin kopiis al vi? Rakontu ĉion, kio, laŭ vi, indas esti sciata, demandata kaj respondata, ne aldonu aŭ falsu ion por plaĉi al mi kaj, pli grave, preterlasu nenion, por ke mi ne ĉagreniĝu.

—Sinjoro —respondis Sancho—, neniuj kopiis al mi la leteron, ĉar verdire mi ne prenis ĝin kun mi.

—Jes, vi pravas —respondis don Quijote—. La kajeron, kie mi skribis ĝin, mi trovis ĉe mi du tagojn post via foriro. Tio forte min ĉagrenis, ĉar mi ne sciis, kion vi farus, kiam vi konstatus la mankon de la letero; mi ĉiam kredis, ke vi revenus ĉi tien de la loko, kie vi rimarkus ĝian neeston.

—Certe mi estus farinta tion —respondis Sancho—, se mi ne parkerus ĝin, kiam via moŝto ĝin legis al mi; mi povis do dikti el la memoro la leteron al sakristiano ĝis la lasta detalo, tiel, ke li diris, ke neniam antaŭe li vidis aŭ legis tiel belan leteron, kiel la via, kvankam li legis en sia vivo multe da ekskomunikaj leteroj.

—Cu vi ĝin memoras ankoraŭ? —demandis don Quijote.

—Ne, sinjoro —respondis Sancho—. Tuj kiam mi diktis ĝin, mi komprenis, ke estus superflue plu reteni ĝin en mia kapo, do apenaŭ mi memoras nur tion pri la «cima», pardonu, pri la «sublima sinjorino» kaj la lastan parton: «Ĝismorte via, la Kavaliro de la Trista Mieno». Kaj inter la komenco kaj la fino mi metis pli ol tricent fojojn «mia koro, mia vivo, miaj okuloj»...

[128] Don Quijote aludas al siaj konversacioj kun Sancho en la ĉapitroj 7-a kaj 21-a.

[129] Fenikso, en sia figura senco de homo supera, unika en sia speco.

[130] Probabla aludo al la incidento ĉe la ful-martelegoj, kiam don Quijote batis per la lanco Sanchon pro ties impertinento (ĉapitro 20-a).

Ĉapitro 31

Pri la sukaj konversacioj okazintaj inter don Quijote kaj ties ŝildisto Sancho Panza, kaj pri aliaj eventoj

—Ĝis nun viaj novaĵoj ne malplaĉas al mi —diris don Quijote—. Daŭrigu. Vi do alvenis tien. Kion faris tiu reĝino de beleco? Sendube, kiam vi trovis ŝin, ŝi surfadenigis perlojn aŭ brodis per oraj fadenoj ian insignon por mi, la kavaliro sklavo de ŝia amo.

—Ne, sinjoro —respondis Sancho—. Mi trovis ŝin, kiam ŝi kribradis du buŝelojn da tritiko en la korto de sia domo.

—Nu, faru al vi la ideon, ke tiuj grajnoj de tritiko, ĉar tuŝitaj de ŝiaj manoj, estas veraj perloj. Sed, diru: ĉu vi rimarkis, ĉu la tritiko estis blanka aŭ bruna?

—Nek blanka, nek bruna, sed ruĝeta —respondis Sancho.

—Bone, mi certigas al vi —diris don Quijote—, ke la tritiko kribrita de ŝiaj manoj donis plej blankan panon. Sed daŭrigu. Kiam vi transdonis al ŝi mian leteron, ĉu ŝi ĝin kisis? Ĉu ŝi metis ĝin sur sian kapon?^[131] Ĉu ŝi faris ian ceremonion indan je la letero? Kion?

—Kiam mi volis doni al ŝi la leteron, ŝi estis plej okupata, skuante la kribrilon plenan de tritiko, kaj diris al mi: «Amiko, lasu la leteron sur ĉi sakon, ĉar mi ne povos ĝin legi, ĝis mi finos kribrigi ĉion ĉi-tiean».

—Kia diskreta sinjorino! —diris don Quijote—. Certe ŝi preferis legi senurĝe la leteron por pli longe ĝui ĝin. Daŭrigu, Sancho. Dum ŝi tiel okupiĝis, kion ŝi parolis kun vi?

Kion ŝi demandis pri mi? Kion vi respondis? Nu, ĉion rakontu, eĉ ne unu guton lasu en la inkujo.

—Nenion ŝi demandis —respondis Sancho—. Sed mi diris al ŝi, kiel via moŝto, kvazaŭ sovaĝulo meze de ĉi montaroj, nuda de la talio supren, pentofaris pro ŝia amo, dormis sur la tero, neniam manĝis ĉe kovrita tablo nek kombis al vi la barbon, kaj nur lamentis kaj riproĉis vian sorton.

—Vi eraris, dirante, ke mi riproĉis mian sorton —diris don Quijote—. Kontraŭe, mi benas kaj benos ĝin ĉiun tagon de mia vivo, ĉar ĝi igis min inda ami sinjorinon tiel altan kiel Dulcinea de El Toboso.

—Tiel alta ŝi estas —respondis Sancho—, ke ŝi superas min per pli ol unu spano.

—Kiel do, Sancho? —diris don Quijote—. Ĉu vi mezuris vin kun ŝi?

—Jes —respondis la ŝildisto—, ĉi-maniere: mi helpis ŝin meti sakon da tritiko sur azenon, kaj tiam ni staris tiel proksimaj unu al la alia, ke mi vidis, ke ŝi altas per pli ol unu granda spano super mi.

—Cu ne vere —diris don Quijote—, ke ŝian staturon akompanas kaj garnas mil milionoj da spiritaj ĉarmoj? Kaj cetere: kiam vi proksimiĝis al ŝi, ĉu vi ne enspiris ian odoron je araba incenso, ian aromon tiel dolĉan, ke mi ne scias ĝin difini, kvazaŭ temus pri la parfumo ŝvebanta en eleganta ganto-butiko?

—Mi povas diri nur —respondis Sancho—, ke mian nazon trafis virkapra odoreto, ĉar sendube pro ŝia peza laborado ŝin kovris ŝvito jam ranca.

—Neeble —diris don Quijote—. Certe vi havis kataron aŭ flaris vin mem, ĉar mi bone konas la odoron de tiu rozo inter dornoj, de tiu lilio kampara, de tiu likva ambro.

—Eble vi pravas —respondis Sancho—, ĉar ofte eliras el mi odoro simila al la odoro ŝajne veninta tiam de sinjorino Dulcinea; kio ne estas stranga, se konsideri, ke unu diablo similas alian.

—Nu, bone —daŭrigis don Quijote—, ŝi finis kribri la tritikon kaj sendis ĝin al la muelejo. Kion ŝi faris, kiam ŝi legis la leteron?

—La leteron ŝi ne legis —respondis Sancho—, ĉar ŝi diris, ke ŝi ne scias legi aŭ skribi. Anstataŭe, ŝi ŝiris ĝin en mil pecojn, deklarante, ke neniu devas ĝin legi, por ke oni ne konu ŝiajn sekretojn en la vilaĝo; ŝi aldonis, ke sufiĉas tio, ke mi parolis al ŝi pri la adoro de via moŝto al ŝia persono kaj pri la eksterordinara pentofaro, kiun vi plenumis por ŝia amo. Fine ŝi petis min diri al via moŝto, ke ŝi kisas al vi la manojn, ke ŝi pli deziras vidi vin ol skribi al vi, kaj ke tial, ŝi vin petas kaj ordonas eliri tuj el inter ĉi vepro, ĉesi fari ekstravagancojn kaj ekiri al El Toboso, se alia pli grava afero ne detenas vin, ĉar ŝi sopiras vidi vian moŝton. Ŝi tre ridis, kiam mi diris al ŝi, ke vi nomiĝas la Kavaliro de la Trista Mieno. Mi demandis, ĉu la vasko de la duelo prezentiĝis al ŝi; ŝi respondis, ke jes, kaj ke li havis aspekton de tre honesta viro. Mi demandis ankaŭ pri la galeruloj; sed ŝi diris, ke neniu el ili aperis ankoraŭ.

—Ĝis nun, ĉio iras bone —deklaris don Quijote—. Sed diru: kian juvelon ŝi donacis al vi pro la novaĵoj, kiujn vi liveris? Ĉar, laŭ antikva kaj tradicia moro, kiam ŝildistoj, servistinoj aŭ nanoj portis novaĵojn inter la vagantaj kavaliroj kaj ties damoj, ili ricevis ian riĉan juvelon kiel rekompenco por siaj mesaĝoj.

—Eble vi pravas, kaj cetera temas pri tre bona moro — respondis Sancho. Sed tio certe okazis en la pasintaj tempoj; ŝajnas ke nuntempe la moro limiĝas al donaco de iom da pano kaj fromaĝo, ĉar sinjorino Dulcinea tion donis al mi super muron de la korto, kiam mi adiaŭis ŝin. Kaj, se ĝuste paroli, temis pri fromaĝo el ŝafina lakto.

—Ŝi estas ekstreme donacema —diris don Quijote—, kaj sendube pro tio, ke ŝi ne havis ĉe-mane oran juvelon, ŝi ne donis ĝin al vi; havu paciencon: la ovoĵoj de la Pasko bonas ankoraŭ post la Sankta Semajno. Mi parolos kun ŝi kaj aranĝos la aferon. Sed, ĉu vi scias, kio plej mirigas min? Tio, ke ŝajne vi iris kaj revenis tra la aero, ĉar vi vojaĝis de ĉi tie ĝis El Toboso kaj returne, proksimume naŭdek mejlojn, en nur iom pli ol tri tagoj. El tio mi konkludas, ke la saĝa sorĉisto, kiu estas mia amiko kaj zorgas pri miaj aferoj (certe mi havas tian amikon, alie mi ne rangus inter la bonaj kavaliroj) sendube helpis vin vojaĝi, sen ke vi konscius lian helpon; ja, ekzistas sorĉistoj, kiuj prenas kavaliron dormantan en la lito, kaj la sekvantan tagon, ne sciante kiel, li troviĝas pli ol mil mejlojn for de la loko, kie li dormiĝis. Se ne pro tio, la vagantaj kavaliroj ne povus helpi unu la alian, kiel ili faras ofte. Por ekzemplo, unu el ili batalas en la montegoj de Armenio kontraŭ drako aŭ feroca monstro, aŭ kontraŭ alia kavaliro, ricevas plej gravajn vundojn kaj kuŝas ĝuste ĉe la rando de la morto; tiam, subite kaj neatendite, nova kavaliro, kiu iomete pli frue troviĝis en Anglujo, aperas sur nuboj aŭ en flamanta ĉaro, savas la vivon de sia amiko kaj, jam en la nokto, denove sidas ĉe si kaj manĝas kontente ĉe la tablo, kvankam ofte la distanco de unu loko al la alia estas ses aŭ sep mil mejloj. Nu, tiaj aferoj okazas dank' al la scio kaj lerto de ĉi saĝaj sorĉistoj, kiuj zorgas pri tiel bravaj kavaliroj. Do, amiko Sancho, mi senhezite kredas, ke vi iris al El Toboso kaj revenis en tiel eta tempo, ĉar, kiel mi ĵus diris, ia sorĉisto, amiko mia, certe portis vin tra la aero, sen ke vi konscius la vojaĝon.

—Jes, sendube —diris Sancho—, ĉar Rocinante trotegis kvazaŭ azeno de cigano kun hidrargo en siaj oreloj.^[132]

—Kun hidrargo? Kaj eĉ kun legio da demonoj! —diris don Quijote—. La sorĉistoj senlace marŝas kaj marŝigas, kiom ajn ili volas. Sed ni lasu ĉi aferon. Kion, laŭ vi, mi devus fari, rilate al la ordono de mia sinjorino iri ŝin vidi? Ĉar, kvankam mi havas la devon obei ŝian postulon, tion obstaklas la promeso de mi donita al la princino nin akompananta. La leĝoj de la kavalirismo preskribas al mi plenumi mian vorton, antaŭ ol zorgi pri mia plezuro. Unuflanke min premas kaj turmentas la deziro vidi mian damon; aliflanke min instigas kaj alvokas la ĵuro, al kiu mi ŝuldiĝas, kaj la gloro, al kiu min kondukos ĉi entrepreno. Sed jen kion mi pensas fari: rapidegi sur la vojo, alveni plej baldaŭ al la loko de la giganto, dehaki al li la kapon, pace surtronigi la princinon kaj tuj poste reveni vidi la sunon, kiu iluminas al mi la koron. Mi praviĝos tiele antaŭ ŝi, ke ŝi fine aprobos mian prokraston, vidante, ke ĉio kreskigas ŝian gloron kaj famon; ĉar kion mi atingis, atingas kaj atingos per la armiloj en ĉi vivo, tio tute devenas de la fakto, ke ŝi favoras min, kaj ke mi estas ŝia sklavo.

—Ho ve! —ekkriis Sancho—. Via moŝto certe ricevis muŝon en la kapon! Diru al mi, sinjoro, ĉu vi serioze pensas iri tiun vojon por nenio kaj lasi tiel riĉan kaj precipan edziĝon, kun unu regno kiel doto, elgliti inter la fingroj? Laŭdire kaj en vero tiu regno havas cirkle pli da sesdek mil mejloj, abundas je ĉio necesa al la homa vivo kaj grandas pli ol Kastilio kaj Portugalujo kune. Silentu, je la amo de Dio, vi devus honti pro viaj vortoj. Bonvolu, mi petas, sekvi mian konsilon: edziĝu en la unua loko, kie ni trovos pastron; se ne, jen nia licenciulo, kiu eminenta aranĝus la aferon. Memoru, ke mi jam havas sufiĉan aĝon por doni konsilojn, kaj ke tio, kion mi konsilas nun, konvenas al vi kiel ringo al fingro, ĉar, kiu ne

akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas, kaj pli valoras birdo en la mano ol cent en la aero.

—Nu, Sancho, se vi konsilas min edziĝi, por ke, mortiginte la giganton, mi regu, faru al vi favorojn kaj plenumu mian promeson al vi, mi devas vin informi, ke mi ne bezonos edziĝi por facile kontentigi vian deziron, ĉar, antaŭ ol iri en la batalon, mi metos la kondiĉon, ke, kiam mi revenos kiel venkinto, mi ricevu, sen ia edziĝo, parton de la regno por disponi ĝin laŭ mia plaĉo. Kaj, kiam mi ĝin havos, al kiu mi ĝin donos, se ne al vi?

—Tre bone —respondis Sancho—, sed bonvolu elekti la parton ĉe-maran, kie, se la lando ne plaĉos al mi, mi povos enŝipigi miajn nigrajn subulojn kaj fari kun ili kion mi jam diris. De via flanko, ne faru al vi la klopodon iri vidi nuntempe sinjorinon Dulcinea; prefere iru mortigi la giganton kaj meti finon al ĉi afero, ĉar, je Dio, mi kredas, ke ĝi havigos al ni grandan gloron kaj profiton.

—Jes, Sancho, vi pravas —diris don Quijote—, kaj laŭ via konsilo mi iros kun la princino, antaŭ ol prezenti min ĉe Dulcinea; sed bonvolu diri al neniuj, eĉ ne al niaj kompanoj, kion ni parolis kaj traktis ĉi tie: Dulcinea estas tiel rezerviĝema, ke ŝi ne volas, ke oni konu ŝiajn pensojn, do ne estas bone, ke mi, aŭ alia persono en mia loko, ilin rivelu.

—Se tiel do —diris Sancho—, kial vi ordonas ĉiun viron de vi venkitan sin prezenti antaŭ sinjorino Dulcinea? Ĉu vi ne montras tiamaniere, ke vi amas ŝin, tiel klare kiel se vi dirus ĝin skribe kaj poste metus vian signaturon? Kaj se konsideri, ke vi devigas ĉiun venkiton genuiĝi antaŭ ŝi kaj diri, ke li venis de via moŝto por submeti sin al ŝi, kiel povas resti kaŝitaj la sentoj de vi ambaŭ?

—Kiel simpla kaj stulta vi estas! —diris don Quijote—. Ĉu vi ne vidas, Sancho, ke ĉio ĉi helpas al la kresko de ŝia gloro? Sciu, ke en nia stato kavalira, kiam multaj kavaliroj servas damon, kaj ilia sola penso estas servi ŝin, simple ĉar temas pri ŝi, la damo ricevas grandan honoron. Kaj la kavaliro esperas, por siaj multaj kaj bonaj favoroj, la solan rekompencan, ke ŝi bonvolu ilin akcepti.

—Mi aŭdis prediki, ke per tia amo oni devas ami Nian Sinjoron, nur pro Li mem, sen ke nin puŝu espero de paradizo aŭ timo de kondamno. Kvankam de mia flanko, mi preferus ami kaj servi Lin pro tio, kion li povus fari por mi.

—La diablo vin prenu! —diris don Quijote—. Tia kampulo, tamen tiel saĝa kelkfoje! Oni eĉ pensus, ke vi estas klera homo.

—Sed mi ĵuras, ke mi se scias legi —respondis Sancho.

Ĉi-momente majstro Nicolás per laŭta voĉo petis ilin iom atendi, ĉar la grupo deziris halti por trinki ĉe proksima fonto. Don Quijote sin detenis, la ŝildisto tre kontentis je tio, ĉar, jam laca mensogadi, li timis, ke la demandoj de lia mastro povus fine senmaskigi lin, des pli, ke Sancho ne konis Dulcinean kaj nur sciis, ke ŝi estas kampulino de El Toboso.

Dume Cardenio sin vestis per la paŝtista kostumo antaŭe portata de Dorotea. Kvankam ne en tre bona stato, almenaŭ ĝi valoris multe pli ol liaj ĉifonoj. La grupo deseliĝis apud la fonto, kaj tio, per kio la pastro siatempe sin provizis en la gastejo, iom mildigis ilian intensan malsaton.

Okazis tiam, ke knabo pasanta sur la vojo haltis, rigardis tre atente la ĉe-fontulojn, kuris iom poste al don Quijote, brakumis al li la krurojn kaj komencis ploregi, dirante:

—Ve, sinjoro! Ĉu via moŝto ne konas min? Rigardu min bone, mi estas Andrés, la knabo, kiun vi liberigis de la kverko, al kies trunko oni min ligis.

Don Quijote rekonis lin, prenis al li la manon, sin turnis al la grupo kaj diris:

—Por ke vi, sinjoroj, vidu, kiel gravas en la mondo la ekzisto de vagantaj kavaliroj por riparo de la ofendoj kaj kanajlaĵoj faritaj de insolentaj kaj malicaj homoj, sciu, ke, antaŭ kelkaj tagoj, pasante ĉe arbaro, mi aŭdis plej korŝirajn kriojn kaj voĉojn, kvazaŭ ili venus de persono afliktita kaj en bezono de helpo. Puŝate de mia devo, mi direktis min al la loko, kie ŝajne sonis la lamentoj, kaj mi trovis ĉi knabon alligita al kverko. Mi tre ĝojas en la koro vidi lin nun, ĉar li atestos, ke mi diras la puran veron. Nu, kiel menciite, li staris ligita al la kverko kaj nuda de la talio supren; kaj unu kampulo (lia mastro, kiel mi poste sciis) ĝissange batadis lin per la brido de sia ĉevalo. Tuj mi demandis lin pri la kaŭzo de tiel kruela draŝado, kaj la bruto respondis, ke li batas la knabon, ĉar tiu estas lia servisto kaj kulpas je iaj neglektoj pli propraj al uloj ŝtelemaj ol al simplaj. Tiam ĉi knabo intervenis, dirante: «Sinjoro, li batas min nur pro tio, ke mi petis de li mian salajron». La mastro replikis, mi ne scias per kiaj ekskuzoj kaj impertinentoj, kaj, kvankam mi ilin aŭdis, mi ne akceptis ilin. Sekve, mi devigis lin deligi la knabon kaj ĵuri, ke li prenos lin kun si kaj pagos al li la tuton, realon post realo kaj eĉ parfumitan. Ĉu mi ne diras la veron, kara Andrés? Ĉu vi ne rimarkis, kiel aŭtoritate mi ordonis, kaj kiel humile li promesis fari ĉion, kion mi volis, postulis kaj preskribis? Respondu sen hezito aŭ embaraso; rakontu la okazaĵon al ĉi sinjoroj, ke oni vidu kaj konfesu, ke, kiel mi diris, la vagantaj kavaliroj utilas sur la vojoj.

—Vi diris nur la veron, sinjoro —respondis la knabo—, sed la afero finiĝis tute male, ol kiel vi imagas.

—Tute male? —respondis don Quijote—. Ĉu la kampulo do ne pagis vin?

—Li ne nur ne pagis min, sed apenaŭ vi eliris el la arbaro, lasinte nin solaj, li religis min al la sama kverko kaj tiel draŝis min, ke mi perdis la haŭton, kiel Sankta Bartolomeo. Kaj kun ĉiu bato, li diris ion mokan kaj ŝercan kontraŭ via moŝto, tiamaniere, ke ankaŭ mi ridus, se mi ne estus sentinta tiel grandan doloron. Nu, li tiel regaligis min per la rimeno, ke mi kuŝis ĝis nun en hospitalo, kie oni kuracis min de la vundoj faritaj de tiu bruto. Kaj vi, sinjoro, kulpas je ĉio, ĉar se vi irus vian vojon kaj ne intervenus tie, kien oni vin ne vokas, kaj vi ne miksus vin en fremdajn aferojn, mia mastro certe kontentiĝus, donante al mi unu dekon aŭ du da rimen-batoj, kaj poste min liberigus kaj kvitiĝus kun mi. Sed, ĉar via moŝto ofendis lin nenecese kaj diris al li tiom da insultoj, li furioziĝis kaj tial, ke li ne povis venĝi sin kontraŭ vi, faligis sur min tiel densan ŝtormon da battoj, ke mi ne scias, ĉu mi povos taŭgi por io en la resto de mia vivo.

—La malbono de la afero kuŝas en tio —respondis don Quijote—, ke mi foriris anstataŭ resti tie por vidi lin pagi. Mi devus scii, el mia longa sperto, ke ne ekzistas kampulaĉo preta teni sian vorton, se li vidas, ke ne konvenas al li ĝin plenumi. Sed certe vi memoras, Andrés, ke mi ĵuris, ke se li ne pagus vin, mi irus lin serĉi kaj trovus lin, eĉ se li sin kaŝus en la ventro de la baleno.^[133]

—Jes —diris Andrés—, sed el via ĵuro nenio bona rezultis.

—Nun ni vidos, ĉu rezultos io bona aŭ ne —respondis don Quijote.

Tion dirante, li rapide stariĝis kaj ordonis Sanchon seli la ĉevalon, kiu sin paŝtis dum la grupo manĝis. Dorotea demandis al li, kion li volas fari. Li respondis, ke li volas iri

serĉi la kampulaĉon, puni lin pro ties malica konduto kaj igi lin pagi al Andrés ĝis la lasta maravedo, eĉ se por tio li devus spiti kaj defii la kampulojn de la tuta mondo. Ŝi replikis, ke li memoru, ke kaŭze de sia promeso li povas miksi sin en nenian aferon, antaŭ ol meti finon al la ŝia, kaj ke, ĉar li konas sian devon pli bone ol iu alia, li certe retenos sian koleron, ĝis li revenos de ŝia regno.

—Vi pravas —respondis don Quijote—. Nepras do, ke Andrés paciencu ĝis mia reveno, kiel vi, sinjorino, diris. Kaj mi ĵuras kaj promesas al li denove, ke mi ne ripozos, ĝis mi vidos lin venĝita kaj pagita.

—Mi ne fidas je tiaj ĵuroj —diris Andrés—. Al ĉiuj venĝoj de la mondo mi preferas kelke da rimedoj por alveni al Sevilla. Se vi havas, donu al mi ion, kion mi povus manĝi kaj preni kun mi, kaj Dio akompanu vian moŝton kaj la ceteron de la vagantaj kavaliroj. Ili estu tiel bonaj vagantoj por si, kiel ili estis por mi.

Sancho elprenis el sia dusako unu pecon da pano kaj alian da fromaĝo kaj donis ilin al la knabo, dirante:

—Jen, prenu, frato Andrés. Ankaŭ mi partoprenas en via misfortuno.

—Ĉu vi? Kiamaniere? —demandis Andrés.

—Per ĉi pecoj da pano kaj fromaĝo —respondis Sancho—, ĉar nur Dio scias, ĉu mi ilin bezonos aŭ ne. Sciu, amiko, ke la ŝildistoj de la vagantaj kavaliroj estas kondamnitaj suferi intensan malsaton, aĉan sorton kaj eĉ aliajn aferojn, kies sekvoj pli bone sentebblas ol direblas.

Andrés prenis la panon kaj fromaĝon kaj vidinte, ke neniu donas al li ion kroman, klinis la kapon kaj ekveturis sur sia

paro de kruroj, kiel oni diras. Tamen, ĉe la ekiro, li diris al don Quijote:

—Je la amo de Dio, sinjoro kavaliro vaganta, se vi renkontus min denove, ne helpu min, eĉ se vi vidus, ke oni distranĉas min en pecojn. Prefere lasu min kun mia misfortuno, ĉar ĝi ne povus esti tiel granda, kiel la plago, kiun alportus al mi la helpo de via moŝto. Dio damnu vin kaj ĉiun vagantan kavaliron naskitan sur la tero.

Don Quijote komencis sin levi por puni lin; sed la knabo tiel kuregis, ke neniu volis sekvi lin. Don Quijote sentis egan humiliĝon pro la historio de Andrés, kaj liaj kompanoj zorge evitis ridi por ne hontigi lin tute.

[131] Meti al si dokumenton aŭ leteron sur la kapon estis montrado de respekto aŭ amo al la sendinto.

[132] Por stimuli la viglon kaj rapidon de la azenoj, kiujn la ciganoj deziris vendi, ili uzis, inter aliaj artifiko, la verŝon de hidrargo en la orelojn de tiuj bestoj.

[133] Aludo al la baleno de la historio pri la profeto Jona.

Ĉapitro 32

Pri tio, kio okazis al don Quijote kaj ties kunuloj en la gastejo

Fininte tiel riĉan manĝon, ili selis, kaj la sekvantan matenon, sen ke okazus io rakontinda, ili alvenis al la gastejo, loko de miro kaj teruro por Sancho Panza; li volus ĝin eviti, sed ĉi-foje devis eniri tien. Rimarkante la aperon de don Quijote kaj Sancho, aliris renkonte kun grandaj montroj de ĝojo, la gastejestro, lia edzino, ilia filino kaj Maritornes; la hidalgo akceptis ilian bonvenon kun solena mieno kaj petis, ke oni preparu al li liton pli bonan ol tiu de la pasinta fojo. La mastrino respondis, ke ŝi havigus al li kuŝejon inda je princo se li pagus pli bone ol en la lasta okazo. Don Quijote konsentis, oni aranĝis al li sufiĉe konvenan liton en la sama subtegmento, kiel pasintfoje, kaj li tuj kuŝiĝis, ĉar li sentis sin tre laca kaj dormema. Apenaŭ don Quijote sin retiris, la mastrino sin ĵetis al la barbiro kaj prenis lin je la barbo, dirante:

—Je la signo de la kruco, vi ne plu uzos mian voston kiel barbon, sinjoro. Redonu ĝin al mi! Ĉar estas vere hontige, kiel malalte trenas sin la ilo de mia edzo, nu, lia kombilo, kiun mi kutime enkroĉis en mian belan voston.^[134]

Kvankam ŝi tiris per sia tuta forto, la barbiro ne volis cedi, ĝis fine la licenciulo diris al li, ke li redonu al ŝi la voston, ĉar ĝi ne plu necesos; ke li montru sin senmaske en sia vera persono, kaj diru al don Quijote, ke li forkuris al la gastejo, post ol la galeruloj lin prirabis. Kaj se don Quijote demandas pri la ŝildisto de la princino, oni respondus, ke ŝi sendis lin antaŭen, por ke li informu al ŝiaj regnantoj, ke ŝi iras revene

al ili, kaj ke ŝin akompanas la savonto de ili ĉiuj. Ĉe tio la barbiro volonte enmanigis la voston al la mastrino, kaj samtempe oni redonis al ŝi ĉion, kion ŝi pruntis por kontribui al la liberigo de don Quijote.

La belo de Dorotea, kaj eĉ la agrabla mieno de la paŝtisto Cardenio, ravis al ĉiuj. La pastro mendis por la grupo tian manĝon, kian oni povus prepari per la provizoj de la gastejo, kaj la mastro, esperante ricevi ĉi-foje pli bonan pagon, surtabligis al ili akcepteblajn pladojn. Dume, don Quijote dormis, kaj oni decidis ne veki lin, pensante, ke li bezonas pli dormi ol manĝi. En la ĉeesto de la gastejestro, lia edzino, ilia filino, Maritornes kaj la klientoj oni parolis ĉe la tablo pri la stranga frenezo de don Quijote, kaj pri ties stato, kiam oni trovis lin en lia pentofaro. De sia flanko, la mastrino informis pri la incidento okazinta inter li kaj la mulisto, kaj vidante, ke Sancho ne troviĝas tie, rakontis ĉe la granda amuzo de la aŭskultantoj, ĉion pri lia bernado. Sed kiam la pastro asertis, ke don Quijote perdis la saĝon pro la kavaliraj romanoj, kiujn li legis, la gastejestro respondis:

—Mi ne scias, kiel tio povas okazi, ĉar verdire ne ekzistas pli bona legaĵo en la mondo. Mi havas ĉi tie du tri tiajn librojn, inter aliaj paperoj, kaj ili ja vivigas, ne nur al mi, sed al multaj aliaj personoj; en la sezono de la rikolto la falĉistoj kelkfoje kunvenas ĉi tie, kaj ĉiam unu el ili, ĉar almenaŭ unu scias legi, prenas unu el la libroj; ni, en la nombro de pli ol tridek ĉirkaŭas lin kaj tiel plezure lin aŭskultas, ke ni forgesas ĉiun zorgon kaj eĉ sentas nin pli junaj. Almenaŭ mi povas diri de mia flanko, ke kiam oni legas pri la teruraj kaj ferocaj batoj kavaliraj, min kaptas la deziro fari la samon, kaj mi volonte sidus tage kaj nokte kun la orelo klinita al la leganto.

—Kaj mi dezirus vidi vin sidi tiel —diris la mastrino—, ĉar mi havas pacon en la domo, nur kiam vi aŭskultas tian legadon.

Vi tiel raviĝas, ke vi eĉ forgesas kvereli tiam.

—Efektive —diris Maritornes—. Kaj ankaŭ mi ŝatas tiel belajn historiojn, ĉefe kiam oni rakontas pri ia damo, kiu kuŝas sub oranĝarbo en la brakoj de sia kavaliro, dum la duenjo,^[135] duonmorta de envio kaj plena de timo, staras garde. Ĉio ĉi estas dolĉa, kiel la mielo, certe.

—Kaj vi, kion vi opinias, estimata pucelo? —demandis la licenciulo al la filino de la mastro.

—Mi ne scias, sinjoro, je mia animo —ŝi respondis—. Ankaŭ mi aŭskultas kaj ŝatas la historiojn, kvankam mi ne bone komprenas ilin. Sed plaĉas al mi, ne la batoj kiel al mia patro, sed la lamentoj de la kavaliroj, kiam ili forestas de siaj damoj. Mi tiel kompatas ilin, ke kelkfoje mi ne povas ne plori.

—Ĉu vi do bone konsolus ilin, se ili lamentus pro vi, kara pucelo? —demandis Dorotea.

—Mi ne scias kion mi farus —respondis la knabino—. Mi scias nur, ke kelkaj tiaj damoj tiel kruelas, ke iliaj kavaliroj nomas ilin tigrinoj kaj leoninoj, inter aliaj mil insultoj. Je Dio! Mi ne komprenas, kiel virinoj povas esti mankaj je koro kaj konscienco, ĝis la ekstremo lasi, ke honesta viro mortu aŭ falu en la frenezon, ĉar ili ne degnas eĉ rigardi lin. Mi ne scias, kial ili delikataĉas tiamaniere. Ĉu por vidigi, ke ili estas virtaj? Nu, dece edziniĝu al la kavaliroj; tiuj deziras nenion alian.

—Silentu, knabino —diris la mastrino—. Ŝajnas al mi, ke vi tre scias pri ĉi aferoj, kaj ne decas al la puceloj scii aŭ paroli tiel multe.

—Ĉi sinjoro demandis al mi, mi devis do respondi —replikis la knabino.

—Bone —diris la pastro—, bonvolu alporti la librojn, sinjoro mastro, mi dezirus ilin vidi.

—Volonte —li respondis.

Li iris al sia ĉambro, revenis kun olda valizo fermita per ĉeneto, ĝin apertis kaj elprenis tri librojn grandajn kaj kelke da paperoj skribitaj per tre bela kaligrafio. La unua libro titoliĝis *Don Cirongilio de Tracia*, la alia *Felixmarte de Hirkanio* kaj la lasta *Historio de la Granda Kapitano Gonzalo Hernández de Córdoba, kun la vivo de Diego García de Paredes*. Tuj kiam la pastro legis la du unuajn titolojn, li turnis sin al la barbiro kaj diris:

—Ni bezonas ĉi tie la mastrumantaron de don Quijote kaj lian nevinon.

—Tute ne —respondis la barbiro—. Ankaŭ mi scias ĵeti librojn al la kralo kaj al la fajrujo; ĝuste nun ni havas en la kameno tre bonan fajron.

—Ĉu via moŝto volas do bruligi al mi la librojn? —demandis la gastejestro.

—Nur ĉi paron: *Don Cirongilio* kaj *Felixmarte* —respondis la pastro.

—Kial? Ĉu okaze ili estas herezaj aŭ flematikaj^[136] kaj meritas do la fajron?

—Certe vi volas diri «cismatikaj»,^[137] amiko —korektis la barbiro—, ne «flematikaj».

—Jes, efektive —respondis la mastro—. Sed, se vi volas bruligi libron, kondamnu ĉi verkon pri la Granda Kapitano kaj pri Diego García, ĉar prefere mi lasus bruligi filon mian ol iun el la du diritaj verkoj.

—Kara amiko —diris la pastro—. Ĉi du libroj plenas de absurdoj kaj ekstravagancoj, dum la alia pri la Granda Kapitano rakontas la veran historion de Gonzalo de Córdoba, kiun la tuta mondo prave alnomis la Granda Kapitano pro ties multaj kaj grandaj prodaĵoj. Kaj tian alnomon, faman kaj brilan, nur li meritis. Rilate al Diego García de Paredes, li naskiĝis en la urbo Trujillo, en Extremadura, estis grava kavaliro kaj aŭdaca soldato kun tiel grandega natura forto forto, ke foje li haltigis per unu fingro muelradon turniĝantan kun plena rapido. Alifoje li staris ĉe la antaŭo de ponto kaj per sia peza glavo detenis densan armeon kaj ne lasis ĝin transpasi la ponton. Li faris multe da aliaj eksterordinaraĵoj similaj, kaj se, anstataŭ li, kiu ilin rakontis kun la modesto de kavaliro kaj de kronikanto de la propraj faroj, alia persono estus ilin skribinta libere kaj senpartie, liaj heroaĵoj puŝus en la forgeson la farojn de ĉiuj Hektoroj, Aĥiloj kaj Rolandoj.

—Ba, aferoj bagatelaj! —ekkriis la mastro—. Li detenis muelradon, kaj tio vin mirigas! Je Dio, vi devus legi kion faris Felixmarte de Hirkanio: per unu sola hako li dividis ĉe la talio kvinopon da gigantoj en du partojn, kvazaŭ iliaj korpoj konsistis el la fabaj guŝoj, kiujn uzas la knaboj por fari figuretojn de monaĥoj. Alifoje li sin ĵetis kontraŭ ege granda kaj potenca armeo el pli ol unu miliono kaj sescent mil soldatoj armitaj de la kapo ĝis la piedoj, kaj ilin dispelis kvazaŭ ŝafinaron. Kion vi dirus pri la brava kaj kuraĝa don Cirongilio de Tracia? En ties libro oni rakontas, ke foje, kiam li navigis sur rivero, fajra serpento aperis antaŭ li meze de la akvo; senplie li ĵetis sin sur ĝin, sidiĝis rajde sur ĝia skvama dorso kaj tiel premegis per la du manoj ĝian kolon, ke la serpento, sentante sin strangolata, ne havis alian rimedon por sin savi, ol lasi sin sinki al la fundo de la rivero; ĝi trenis kun si la kavaliron, ĉar li ne volis disiĝi de la besto, kaj kiam li alvenis al la fundo, li troviĝis inter palacoj kaj ĝardenoj mirinde belaj; la serpento transformiĝis en oldulon kaj diris al la kavaliro multege da mirindaĵoj. Oni ne povus aŭdi ion

pli plaĉan. Certe, sinjoro, se vi legus la libron, ĝi donus al vi egan plezuron. Eĉ ne unu figon valoras via Granda Kapitano kaj via Diego García!

Ĉe tio Dorotea flustris al Cardenio:

—Ne multe mankas ke li estu la dua don Quijote.

—Same mi opinias —respondis Cardenio—, ĉar, se juĝi kion li diras, li kredas, ke la rakontoj de tiuj libroj estas certaj ĝis la lasta detalo; eĉ nud-piedaj karmelanoj ne povus igi lin pensi alie.

—Sciu, frato —daŭrigis la pastro—, ke neniam ekzistis en la mondo Felixmarte de Hirkanio, nek don Cirongilio de Tracia, nek la aliaj kavaliroj de la libroj. Temas pri fikcioj elpensitaj kaj verkitaj de senokupuloj por ke, kiel faras viaj falĉistoj, oni distre pasigu la tempon ilin legante. Sed mi ĵuras al vi, ke tiaj kavaliroj neniam ekzistis en la mondo, kaj ke neniam okazis tiaj faroj kaj absurdoj.

—Ludu aliloke vian muzikon! —respondis la mastro—. Kvazaŭ mi ne sciis, kiom da fingroj mi havas en la mano, kaj kie min doloras la ŝuo! Ne provu nutri min per kaĉo, je Dio, mi ne estas bebo. Bele de vi, voli min konvinki, ke ĉi bonaj libroj diras nur absurdojn kaj mensogojn! Ĉu la librojn oni ne presas sub licenco de la membroj de la Reĝa Konsilo? Ĉu ili estas homoj, kiu lasus aperi tiom da mensogoj, bataloj kaj ensorĉoj por renversi la cerbon de la legantoj?

—Amiko, mi jam diris —respondis la pastro—, ke oni faras tion por nia distro. Kaj same kiel en bone aranĝitaj ŝtatoj oni permesas al la personoj, kiuj ne volas, ne devas, aŭ ne povas labori, ke ili amuziĝu ludante ŝakon, pilkon aŭ bilardon, tiel same oni permesas la publikigon de tiaj libroj, kredante, ke ne povas ekzisti homo sufiĉe stulta por rigardi fabelon kavaliran kiel veran historion. Se estus nun okazo oportuna,

kaj se miaj aŭskultantoj dezirus, mi dirus ion pri la kvalitoj, kiujn la kavaliraj libroj bezonas por esti bonaj, kaj miaj vortoj eble povos utili kaj plaĉi al kelkaj; sed mi esperas, ke iam mi havos la okazon paroli pri ĉi aferoj kun koncernatoj, kiuj prenos en konsideron miajn observojn. Dume, sinjoro mastro, kreu min, prenu viajn librojn kaj mem decidu, ĉu ili veras aŭ mensogas. Ili faru al vi bonon, kaj Dio volu, ke vi neniam lamu per la sama piedo kiel via gasto don Quijote.

—Tio ne! —diris la gastejestro—. Mi ne tiel frenezas, ĝis la ekstremo fariĝi vaganta kavaliro. Mi klare vidas, ke nun ne okazas, kiel okazis en la antikvaj tempoj, kiam laŭdire iris tra la mondo ĉi famaj kavaliroj.

Sancho eniris en la ĉambron meze de ĉi konversacio kaj, aŭdante, ke jam ne ekzistas vagantaj kavaliroj, kaj ke la libroj kavaliraj temas pri nur mensogoj kaj absurdoj, restis tre konfuzita kaj enpena. Li do faris al si la decidon atendi ĝis la fina rezulto de la vojaĝo de lia mastro, kaj, se ĝi ne sukcesus, male al lia espero, li forlasus la hidalgon kaj revenus al sia edzino kaj al sia ordinara laboro.

La gastejestro pretis forporti denove la valizon kaj la librojn, sed la pastro diris al li:

—Atendu, mi deziras vidi pri kio temas tiuj paperoj tiel bele manskribitaj.

La gastejestro prenis kaj transdonis ilin al la pastro. Temis pri kajero el ok manskribitaj foliantoj, ĉe kies komenco legiĝis la jena, grand-litera titolo: *Novelo pri la stulta scivolo*. La pastro legis al si tri aŭ kvar liniojn kaj diris:

—Vere mi ŝatas la titolon de ĉi novelo kaj dezirus legi ĝin tuta.

—Laŭ via plaĉo, sinjoro pastro —respondis la gastejestro—. Sciu, ke kelkaj el miaj gastoj legis kaj tre ĝuis ĝin kaj insiste petis, ke mi donu al ili la novelon. Sed mi ne cedis al iliaj petoj, ĉar mi pensas ĝin redoni al la persono lasinta ĉi tie, en momento de forgeso, la valizon kun la libroj kaj la paperoj; eble li revenos iam kaj, kvankam mi scias, ke mi sentos la mankon de la libroj, tamen mi redonos ilin al li, ĉar mi estas gastejestro, sed ankoraŭ kristano.

—Vi tre pravas, amiko —diris la pastro—, sed, se la novelo plaĉos al mi, ĉu vi lasos, ke mi faru kopion de ĝi?

-Tre volonte, —respondis la mastro.

Dum la du parolis, Cardenio prenis la novelon kaj komencis legi ie tie. Li formis al si la saman opinion kiel la pastro kaj petis ĉi lastan, ke li legu ĝin voĉe al ĉiuj.

—Mi tion farus —diris la pastro—, se ne estus pli konvene pasigi ĉi tempon dormante.

—Mi havus plej bonan ripozon, se mi distrus min aŭskultante rakonton —diris Dorotea—. Mia spirito ne estas ankoraŭ tiel serena, ke ĝi lasus min dormi siatempe.

—Se tiel do —diris la pastro—, mi ĝin legos, eĉ se nur pro scivolo. Eble ni trovos ion plaĉan en ĝi.

Majstro Nicolás, same kiel Sancho, faris al li la saman peton; kaj la pastro, vidante, ke li kontentigos la aliajn kaj sin mem, diris:

—Nu, bone, ĉiu atendu: jen kiel komenciĝas la novelo.

[134] Evidentas la erotikaj aludoj de la mastrino.

[135] Neologismo. Hispane «dueña». Damo, ĝenerale vidvino, kiu servis kaj akompanis pli riĉan aŭ pli altrangan fraŭlinon.

[136] Esperantigo de la hispana «flemáticas» (flegmaj) por pli ĝusta redono de la originalo.

[137] Esperantigo de la hispana «cismáticas» (skismaj) por pli ĝusta redono de la originalo.

Ĉapitro 33

La novelo pri la stulta scivolo

En Florenco, prospera kaj fama urbo itala de la provinco Toskanio, vivis Anselmo kaj Lotario, du kavaliroj riĉaj kaj gravaj, tiel intimaj inter si, ke ĉiu ilin konanta, nomis ilin antonomazie kaj superdistinge «la du amikoj». Ili estis junaj, fraŭlaj, kun la sama aĝo kaj la samaj kutimoj, do ekzistis forta kaŭzo por ilia reciproka amikeco. Verdire, Anselmo iom pli inklinis al la logoj de la amo ol Lotario, kiu preferis la ĝuojn de la ĉaso. Sed, kiam la okazo prezentiĝis, Anselmo flankmetis siajn ŝatojn por partopreni en la distroj de Lotario, kaj Lotario flankmetis la siajn por akompani Anselmon en ties plezuroj. Iliaj volo funkciiis do en tia akordo, kian ne posedas inter si la pecoj de la plej preciza horloĝo.

Anselmo sentis pasian amon al bela kaj alt-ranga pucelo de la urbo. Ŝi estis de tiel bona familio, kaj tiel bona per si mem, ke, kun la aprobo de sia amiko Lotario, sen kiu li faris nenion, Anselmo decidis peti ŝin kiel edzinon disde ŝiaj gepatroj. Lotario prenis sur sin la aferon de la peto kaj tiel sukcese ĝin finis, ĉe la kontento de sia amiko, ke iomete poste Anselmo posedis la objekton de siaj deziroj. De sia flanko, Camila tiel ĝojis, ke ŝi ricevis Anselmon kiel edzon, ke ŝi ne ĉesis danki al la ĉielo, kaj ankaŭ al Lotario, kies perado havigis al ŝi tiom da feliĉo.

En la unuaj tagoj post la edziĝo, dediĉitaj al la ĝojo, kiel ordinare en ĉi okazoj, Lotario iris laŭkutime al sia amiko kaj klopodis honori, regali kaj amuzi lin, kiom li povis. Sed kiam la nupto finiĝis, kaj la nombro de vizitantoj kaj gratuloj defalis, Lotario komencis aperi nur sporade ĉe Anselmo, ĉar ŝajnis al li (kiel devas ŝajni al ĉiu diskreta homo) ke decas

nek frekventi nek viziti la hejmon de edziĝinta amiko tiel libere, kiel en la tempo de lia fraŭleco, ĉar, kvankam inter bonaj kaj sinceraj amikoj ne povas, nek devas, ekzisti motivo de suspekto, tamen la honoro de edzo tiel delikatas, ke ĝin povas difekti eĉ la vizitoj de lia frato, tiom pli do de lia amiko.

Anselmo, rimarkinte la retiriĝemon de Lotario, tre riproĉis lin kaj diris, ke se li sciintus, ke la edziĝo kulpas la perdon de iliaj kutimaj rilatoj, li vivus ankoraŭ fraŭlo; li petis lin ne rompi, pro senfundamenta delikateco, la harmonion, kiu regis inter ili, kiam ambaŭ fraŭlis, kaj kiu gajnis por ili la belan titolon «la du amikoj». Fakte, Anselmo lin suplikis —se tia vorto povus rajte uziĝi inter ili—, ke li rigardu lian domon denove kiel propran, kaj ke li iru tien tiel libere kiel antaŭe. Anselmo asertis, ke lia edzino Camila nur pensas kaj volas kion li deziras, ke ŝi scias pri ilia varma amikeco kaj ke, sekve, ŝi perpleksus, se ŝi vidus en Lotario tiel grandan sindetenon.

Al tielaj argumentoj, kaj al multaj similaj uzataj de Anselmo por persvadi lian amikon reveni al li kiel antaŭe, Lotario respondis tiel prudente, diskrete kaj saĝe, ke liaj bon-intencaj skrupuloj plaĉis al Anselmo, kaj fine ili interkonsentis, ke Lotario manĝus ĉe li du fojojn semajne, kaj krome ankaŭ en la festotagoj. Malgraŭ tia aranĝo, Lotario intencis fari nur kion li vidus pli konvena al la honoro de Anselmo, kies reputacion li atentis pli ol la propran. Li opiniis, kaj prave, ke viro ricevinta de la ĉielo belan edzinon devus tiel same atenti pri la amikoj, kiujn li akceptas ĉe si, kiel pri la amikinoj de la edzino; ĉar, kion oni ne faras nek aranĝas en la strato, en la preĝejo, en la publikaj festoj aŭ en la vizitoj al la temploj (lokoj, kiujn la edzo ne ĉiam devas prohibi al la edzino), tion oni faras kaj faciligas ĝuste en la hejmo de la amikino aŭ parencino, al kies seriozo havas la edzo plejan konfidon. Lotario diris ankaŭ, ke ĉiu edzo devus

havi amikon kapablan averti lin pri ties eraroj de konduto, ĉar ofte, kaŭze de sia granda amo al la edzino, la edzo ne avertas ŝin, pro timo ŝin ĉagreni, ke ŝi faru, aŭ ne faru, ion, kio povus evidentiĝi noca al lia honoro. Sed, se la amiko avertus lin pri ties preteratento, li facile metus rimedon al ĉio. Tamen, kie troviĝas amiko tiel lojala, sincera kaj diskreta, kiel Lotario deziris? Mi ja ne scias. Nur Lotario estus tia viro; li zorgis plej skrupule pri la honoro de sia amiko kaj klopodis redukti kaj limigi la nombron de la rendevuaj tagoj, por ke la plebo senokupa kaj la okuloj malice scivolaj ne havu motivon por kritiki, ke viro juna, nobela kaj, krome, dotita, kiel li pensis, per aliaj bonaj kvalitoj, eniras en la domon de tiel bela virino kiel Camila. Ĉar, kvankam ŝia virto kaj merito sufiĉis por bridi ĉian langon malican, li neniel volis, ke eĉ plej ete suferu la reputacio de Camila kaj de ties edzo. Tial, la pliparton de la rendevuaj tagoj li okupiĝis aliloke per aliaj aferoj, pretekstante, ke nepras ilin trakti; sekve, kiam la du amikoj kunvenis, la pli granda parto de la tempo pasis inter riproĉoj de unu flanko kaj ekskuzoj de la alia.

Okazis do, ke, kiam foje ili promenis sur kampo eksterurbe, Anselmo diris la jenon al Lotario:

—Certe vi pensas, amiko Lotario, ke mi ne povus sufiĉe danki la ĉielon, ke ĝi faris min filo de bonegaj gepatroj, kiel la miaj; ke ne per avara mano ĝi regalis min per favoroj de la fortuno kaj de la naturo, kaj, ke, ĉefe, ĝi donis vin al mi kiel amikon, kaj Camilan kiel edzinon: du trezorojn kies valoron mi taksas, se ne kiom mi devas, almenaŭ kiom mi povas. Nu, malgraŭ tiom da bonoj, per kies tuto ajna homo povus kaj devus senti sin kontenta, mi vivas en la pleja despero kaj ĉagreno de ĉi mondo, ĉar, jam de kelkaj tagoj, min premas kaj turmentas deziro tiel stranga kaj eksterordinara, ke mi miras je mi mem. Kiam sola, mi min riproĉas kaj klopodas sufoki kaj kaŝi ĝin antaŭ mia propra konscienco; sed tiel neblas al mi reteni ĉi sekreton, ke verdire mi sentas min

kvazaŭ mi volus ĝin proklami al la tuta mondo kaj, ĉar fine mi ne sciis ĝin gardi, mi volas konfidi ĝin al la arkivo de via brusto, esperante, ke, dank' al la diligento inspirata de via amikeco, mi vidos min baldaŭ libera de ĉi pezega angoro; kaj pro via helpo kreskos mia feliĉo ĝis tia grado, kian atingis mia despero pro mia freneza obsedo.

Egan konfuzon sentis Lotario ĉe la vortoj de Anselmo, kaj ne imagis, kien kondukus tiel longa prefaco aŭ antaŭparolo; ĉar, kvankam li serĉis en sia kapo, kia deziro povas tiel turmenti lian amikon, li ĉiam tre distis de la vera kaŭzo. Por meti finon al ĉi suspenso, li respondis, ke Anselmo faris evidentan ofendon al lia amikeco, serĉante ĉirkaŭfrazojn por konfidi al li siajn plej sekretajn pensojn, kvankam Anselmo tre bone sciis, ke li povas ricevi de li, aŭ konsilon por ilin serenigi, aŭ rimedon por ilin efektiviĝi.

—Vi pravas —respondis Anselmo—, kaj, ĉar mi plene fidas je vi, mi konfesas al vi, amiko Lotario, ke min torturas la deziro scii, ĉu mia edzino Camila estas tiel honesta kaj perfekta, kiel mi pensas. Sed mi ne povos koni la veron, se mi ne provos ŝin tiel, ke la provo rivelu la puron de ŝia honesto, same kiel la fajro rivelas la puron de la oro. Mi ja opinias, kara amiko, ke oni ne povas konsideri virinon virta, se oni ŝin ne tentis, kaj mi proklamas ŝin honesta, nur se ŝi ne cedas al promesoj, donacoj kaj larmoj, kaj al daŭra sieĝo de persistaj amindumantoj. Kial danki al ŝi pro ties virto, se oni ne logis ŝin al mavo? Ĉu havas meriton tio, ke virino estas pudora kaj virta, se oni ne donas al ŝi la okazon, ke ŝi konduku libere, kaj se ŝi scias, ke la edzo prenis de ŝi la vivon ĉe ŝia unua mispaŝo?

»Sekve do, mi estimas ne tiel la virinon, kiu virtas pro timo aŭ pro manko de okazo, kiel la virinon, kiu, malgraŭ tentoj kaj kaĵoloj de amindumantoj, elpaŝas el la batalo kun la krono de la venko. Nu, pro ĉi motivoj, kaj pro multaj aliaj

aldoneblaj por apogo kaj konfirmo de mia opinio, mi deziras, ke mia edzino Camila trapasu ĉi rigoran provon, hardante kaj forĝante sin en la tentoj kaj kaĵoloj de viro kun kuraĝo sufiĉa por fari ŝin objekto de liaj deziroj. Se, kiel mi esperas, ŝi elpaŝos el la provo kun la laŭroj de la triumfo, mi taksos mian feliĉon senegala, povos diri, ke plenos ĝisrande la glaso de miaj deziroj, kaj ke mi havis la bonŝancon ricevi la kapablan virinon menciitan de la Saĝulo.^[138] Kaj se el la provo rezultos la malo de miaj esperoj, tamen mi kontentos, ĉar, vidante ĝusta mian opinion, mi eltenos senplende la doloron, kiun certe kaŭzos al mi tiel riska entrepreno.

»Nu, ĉar per nenia argumento vi povos dekonvinki min de la efektivigo de mia intenco, mi volas, amiko Lotario, ke vi mem estu la instrumento dononta konkretan formon al ĉi projekto. Mi zorgos, ke vi havu la necesajn ŝancojn por ĝin plenumi, do vi povos senĝene amindumi virinon ĉastan, virtan, hejmosidan, modestan. Min movas interalie konfidi al vi ĉi riskan taskon, la scio, ke, se vi konkeros la koron de Camila, vi ne profitos la okazon ĝis la lasta konsekvenco, kaj, ke, por konsidero al mia persono, vi tenos vin inter la limoj de la deco. Tiel ŝi min vundus nur per la intenco, kaj la ofendo kuŝus kaŝite en via virta silento, kiu, kiel mi bone scias, eternus, en tio, kio min koncernas, kiel la silento de la morto. Sekve do, se vi volas, ke mi vivu re per vera vivo, necesas, ke vi jam eniru en ĉi batalon de amo, ne fride kaj hezite, sed arde kaj persiste, kiel mia amikeco postulas kaj via amikeco garantias.

Lotario aŭskultis la argumentojn de Anselmo tiel atente, ke li diris nenion, krom la iomo da vortoj ĉi tie registritaj, kaj kun fermitaj lipoj atendis ĝis lia amiko finis paroli; tiam Lotario fikse rigardis lin, kvazaŭ li vidus por la unua fojo ion ŝokan kaj teruran, kaj diris:

—Mi preferas kredi, kara Anselmo, ke, kion vi ĵus diris, tio limiĝas al nura ŝerco. Alie vi ne estus parolinta tiel longe, ĉar mi tute ne aŭskultus vin. Mi pensas, ke vi ne konas min, aŭ ke mi vin ne konas. Sed ne, mi ja bone scias, ke vi estas Anselmo, kaj vi scias, ke mi estas Lotario; la domaĝo kuŝas en tio, ke mi kredas, ke vi ne estas la ordinara Anselmo, kaj ŝajne vi opiniis, ke mi ne estas la kutima Lotario, ĉar tio kion vi ĵus diris, ne decas al mia amiko Anselmo, kaj de la Lotario de vi konata oni ne povas peti kion vi deziras. La bonaj amikoj provu kaj helpu unu la alian, kiel diris la poeto: *usque ad aras*,^[139] sed ili ne devus uzi la amikecon por la efektivigo de aferoj kontraŭaj al la leĝoj diaj. Nu, se tiel sentis pagano, ĉu ne devas des pli senti tiel la kristanoj, sciante, ke pro nenia amikeco homa perdiĝu la dia? Kaj se oni decidas transiri ĉiun limon kaj ignori sian devon por plenumi la deziron de amiko, tion oni faru almenaŭ, ne por bagateloj aŭ neniaĵoj, sed por la bono de la honoro kaj la vivo de la amiko.

»Nun, Anselmo, diru al mi, ĉu via vivo aŭ honoro troviĝas en tia danĝero, ke mi devas riski min, plenumante, por via kontento, tiel abomenan aferon, kiel vi petas de mi? Certe ne. Mi vidas, ke, male, vi deziras, ke mi provu kaj klopodu preni de vi, kaj samtempe do de mi, la honoron kaj la vivon. Se mi prenis de vi la honoron, evidentas, ke mi prenis ankaŭ vian vivon, ĉar homo sen honoro estas pli morta ol homo efektive pereinta. Kaj se, kiel vi volas, mi fariĝus instrumento de tiela misfortuno via, ankaŭ mi vidus min sen honoro kaj sekve sen vivo. Aŭskultu, amiko Anselmo, kaj havu la paciencon ne respondi, ĝis mi diros ĝisfine kion mi pensas pri ĉi subjekto. Poste vi havos sufiĉan tempon por respondi, kaj mi por aŭskulti.

—Tre volonte —diris Anselmo—. Parolu laŭplaĉe.

—Ŝajnas al mi, Anselmo, ke via kapo funkcias nun kiel ordinare la kapo de la maŭroj; neblas ilin konvinki pri la eraroj de ilia sekto per citaĵoj de la Sankta Skribo, per spekulativa rezonado aŭ per argumentoj bazitaj sur principoj de la fido; necesas la prezento de ekzemploj palpeblaj, simplaj, kompreneblaj, demonstreblaj kaj nedubeblaj, kun nerefuteblaj pruvoj matematikaj, kiel: «Se el du egalaj kvantoj oni retiras du egalajn partojn, la restoj estas egalaj». Kaj se la maŭroj ne komprenas la aksiomon laŭ la vortoj (kio fakte okazas) oni devas ekspliki la ekzemplon per la manoj kaj meti ĝin antaŭ iliaj okuloj. Kaj malgraŭ ĉio, oni neniel povas ilin konvinki pri la veroj de nia sankta religio.

»Mi kredas, ke konvenus uzi kun vi la saman metodon, ĉar ĉi deziro via tiel ekstravagancas kaj tiel distas de ĉia ŝajno de saĝo, ke mi perdus la tempon, se mi klopodus igi al vi kompreni vian stulton; mi ne volas ankoraŭ doni al ĝi alian nomon, kaj eĉ sentas inklinon forlasi vin en via frenezo, kiel puno por via mizera deziro. Sed, ĉar mi amas vin kiel amikon, mi ne povus trakti vin tiel rigore, lasante vin en evidenta danĝero de pereo.

»Por ke vi vidu la aferon klara, diru, Anselmo: ĉu vi ne petis min amindumi, tenti, kaĵoli kaj korupti virinon hejmosidan, ĉastan, honestan kaj modestan? Jes, ja, tion vi petis. Sed, se vi scias, ke vi havas hejmosidan, ĉastan, honestan kaj modestan edzinon, kion do vi serĉas? Kaj se vi kredas, same kiel mi, ke ŝi eltirus sin venke el mia sieĝo, kiom da novaj honoraj titoloj ŝi ricevus de vi? Per kio ŝi superus sian nunan dignon? Aŭ vi ne kredas kion vi diras pri ŝi, aŭ vi ne scias kion vi volas. Se vi kredas ŝin ne virta, kial vi deziras provi ŝin, anstataŭ trakti ŝin kiel mavan kaj ŝin puni, kiel, laŭ via opinio, ŝi meritas? Sed, se vi kredas ŝin bona, estus stulte submeti la veron al eksperimentoj, ĉar ili neniel ŝanĝus vian altan opinion pri ŝi. Evidentas do, ke fari ion, kio povus damaĝi sen doni profiton, estas propra al temeraraj kaj

sensencaj spiritoj, precipe kiam oni entreprenas ion tian, ne devigite, sed libere kaj memvole, eĉ se jam de longa distanco ĝi vidiĝas kiel absoluta frenezo.

»Oni sin ĵetas al altaj taskoj pro Dio, pro la mondo, aŭ pro ambaŭ. La taskojn pro Dio entreprenas la sanktuloj, klopodante vivi anĝelan vivon en homa korpo; la taskojn pro la mondo entreprenas la homoj, kiuj navigas sur senlimaj maroj, sin puŝas tra foraj landoj kaj ekzotikaj gentoj kaj eltenas multege da klimatoj por akiro de la tiel nomataj bonaĵoj de la Fortuno. Kaj la simultanajn taskojn pro Dio kaj pro la mondo entreprenas aŭdace la soldatoj, kiam, vidante en la remparoj de malamika fortreso breĉon faritan de ronda kanon-kuglo, ili sin impulsas, per la flugiloj de sia fervoro, batali por sia kredo, sia patrio kaj sia reĝo, kaj ignorante ĉian danĝeron ĵetas sin sentime, en la mezon de morto embuskanta sub mil diversaj formoj. Tiaj taskoj, kiam oni ilin frontas, alportas honoron, gloron kaj profiton. Sed la tasko, kiun laŭdire vi volas entrepreni, alportus al vi nek gloron ĉielan, nek bonaĵojn de Fortuno, nek famon inter la homoj, ĉar en la okazo de sukceso, kiel vi esperas, vi ne vidus vin pli feliĉa, pli riĉa aŭ pli honorata ol nun, kaj, en la kontraŭa okazo, vi falus en la plejan mizeron imageblan; la fakto, ke oni ne konus vian misfortunon, donus al vi nenian konsolon, ĉar vi mem ĝin konus, kaj tio sufiĉus por aflikti kaj torturi vin. Por konfirmo de ĉi vero, jen stanco aperanta ĉe la fino de la unua parto de *Larmoj de Sankta Petro*, de la fama poeto Luis Tansilo:^[140]

En Petro kreskas honto kaj doloro,
kiam la suno la matenon kronas.
Neniun vidas li, sed en la koro
pro sia peko li en honto dronas,
ĉar, por hontadi, viro de honoro
sin senti rimarkata ne bezonas.

Se li misagas, lin posedas honto,
eĉ se lin vidas nur dezerta mondo.

»La sekreto do ne mildigus vian doloron, kaj, se ne larmojn el la okuloj, vi verŝus sangon el la koro, kiel okazis al la naiva doktoro, kiu, laŭ la rakonto de nia poeto, faris la provon de la glaso, dum la prudenta Reinaldos sin detenis de tio.^[141] Kvankam temas pri poezia fikcio, ĝi gardas en si moralan instruon, kiun konvenas mediti kaj sekvi. Krome, se vi atente aŭskultos min, fine vi konvinkiĝos, ke vi deziras fari gravan eraron.

»Diru, Anselmo: se pro favoro de la ĉielo, aŭ de la sorto, vi venus en posedon leĝan de tre fajna diamanto, kies puro kaj valoro plene plaĉus al la tuta gildo de gemistoj; se ili unuanime asertus, ke temas pri la ŝtono plej perfekta en ĉiuj rilatoj, kaj se vi mem rigardus ĝin tia, sen ia ombro de dubo, ĉu estus prudente de via flanko preni la diamanton, meti ĝin sur amboson kaj ĝin frapi per fortaj martelbatoj por vidi ĉu ĝi montriĝos tiel dura kaj valora, kiel oni asertis? Pensu, ke se la ŝtono eltenus tiel senmotivan trakton, nenio aldoniĝus al ĝia famo kaj valoro. Kaj se ĝi rompiĝus (kio facile povus okazi), ĉu vi ne perdus ĉion? Jes, kompreneble, kaj vin oni ĉie rigardus kiel stultan.

»Nu, amiko Anselmo, pensu, ke Camila estas fajnega diamanto alte estimata de vi kaj de la ceteraj personoj, do oni ne agus prudente submetante ŝin al la risko de detruo; se ŝi eltenus, ŝi ne povus akiri pli da valoro ol nun; sed, se ŝi cedus, kaj perdus la virton, kio okazus al ŝi? Prave vi riproĉus vin mem, ĉar vi kulpus je ŝia kaj je via pereco. Pensu, ke ne ekzistas en la mondo gemo tiel valora kiel virino ĉasta kaj honesta, ke la honoro de la virinoj konsistas nur en ties bona reputacio, kaj ke la bona famo de via edzino superas ĉion imageblan. Kial do vi volas pridubi ĉi veron? Nu, amiko Anselmo, la virino estas neperfekta homo, do oni devas ne

meti kaptilon antaŭ ŝi, por ke ŝi stumblu kaj falu en ĝin, sed forigi ĉiun baron de ŝia vojo, ke ŝi povu facile kaj senĝene atingi sian perfektigon, t.e. la virton.

»La natur-sciencistoj diras, ke ĉasisto, por kapti ermenon kun ties blankega felo, faras jenon: observinte la lokojn frekventatajn de la eta besto, blokas ilin per koto kaj poste alpelas tien la ermenon. Nu, kiam ĝi alvenas al la koto, ĝi haltas kaj lasas sin kapti prefere ol pasi tra la ŝlimo kaj makuli kaj difekti sian blankon, kiun ĝi estimas pli ol la liberon kaj la vivon. La virino ĉasta kaj honesta similas al ermeno, kaj ŝia virto kaj pudoro pli puras kaj blankas ol neĝo. Kaj se viro volas, ke ŝi ne perdu la ĉaston, sed kontraŭe, ke ŝi retenu kaj konservu ĝin, li devas ne trakti ŝin kiel ermenon, metante antaŭ ŝi la koton, t.e. la donacojn kaj flatojn de persistaj amindumantoj, ĉar eble, nu, certe, ŝi havas nek sufiĉan virton, nek sufiĉan naturan forton por eviti per si mem tiajn embuskojn; li devas do deturni ŝin de ili kaj montri al ŝi la puron de la virto kaj la belon de la bona famo. La virta virino similas ankaŭ al spegulo el brila kaj klara kristalo, kies surfacon la plej eta spiro makulas kaj vualas. Ĉastan virinon oni devas adori, sed ne tuŝi, kvazaŭ sanktan relikvon, kaj estimi kaj gardi ŝin, kiel ĝardenon plenan de floroj, kies mastro ne toleras, ke oni tretu la padojn kaj manumu la rozojn, kaj nur permesas, ke oni ĝuu ilian aromon kaj belon de fore kaj tra feraj kradoj. Fine, mi volas diri al vi kelke da versoj, kiujn mi aŭdis en moderna komedio.^[142] Mi ilin memoras nun, kaj ŝajnas al mi, ke ili taŭge rilatas al nia temo. Sagaca oldulo konsilis al alia, la patro de pucelo, ke li ŝin gardu kaj retenu en la hejmo; kaj interalie li proklamis la jenon:

Vitra estas la virin',
ĉu rompeblas ŝi aŭ ne?
Ĉar absurdas ĉi ide',
do ne volu provi ĝin.

Ŝi splitiĝus, ĉar ŝi feblas,
kaj ne havus vi racion
rompi al pecetoj ion,
kio ne rekonstrueblas.
Certe ĉiuj same pensas,
la motivon vi jam vidas:
se Danaaj ie sidas,
ankaŭ oro-pluvoj densas.^[143]

»Ĝis nun, amiko Anselmo, nur vin koncernis miaj diroj;
konvenas do, ke mi jam diru ion rilate min, kaj se mi parolos
tro longe, pardonu, ĉar al tio min puŝos la labirinto, kien vi
eniris, kaj el kie vi volas elpaŝi per mia helpo. Vi rigardas min
kiel vian amikon; tamen vi pretendas preni de mi la honoron,
kio tute kontraŭas al la principoj de la amikeco. Kaj eĉ pli: vi
volas ankaŭ, ke mi prenu de vi la honoron vian. Evidentas,
ke vi volas preni ĝin de mi, ĉar kiam Camila vidis, ke mi
amindumas ŝin, kiel vi deziras, certe ŝi juĝos min viro sen
honoro kaj digno, konsiderante, ke mi entreprenas ion tute
kontraŭan al mia est-maniero kaj al la devoj truditaj de la
amikeco. Same evidentas, ke vi deziras, ke mi prenu de vi la
honoron, ĉar, kiam Camila vidis, ke mi ŝin amindumas, certe
ŝi pensos, ke mi rimarkis en ŝi ian nedecan frivolemon, kaj
ke tio kuraĝigis min riveli al ŝi mian fian deziron; sekve ŝi
konsideros sin virino kun perdita honoro, kaj ankaŭ vi falos
en la saman honorperdon, ĉar ŝi estas parto de vi mem. De
tio venas la fakto ke, kvankam la edzo de adultulino scias
nenion pri ŝia kulpo kaj neniam donas al ŝi motivon aŭ
pretekston por ŝiaj mispaŝoj, kaj ne povas eviti sian
misfortunon, eĉ se li kondukas dece kaj zorgeme, tamen oni
nomas kaj mokas lin per vorto insulta kaj fia, anstataŭ lin
kompati; la homoj konantaj la kulpon de lia edzino rigardas
lin per disdegnaj okuloj, kvankam li falis en tielan
misfortunon, ne pro sia kulpo, sed pro la dignomanko de sia
kunulino. Sed mi povas diri al vi, kial la edzo de pekantino
perdas la honoron, eĉ se li nek scias sian misfamiĝon, nek

kulpas pri ĝi, nek donas okazon aŭ intervenas por ke ŝi peku. Do ne laciĝu aŭskulti, ĉar la temo utilos al vi.

»Kiam Dio kreis nian unuan patron en la tera paradizo, diras la Sankta Skribo, ke Dio igis lin profunde dormi kaj en lia dormo Li elprenis unu el la ripoj de lia liva flanko kaj ĝin transformis en nian patrinon Eva. Kaj tuj kiam Adamo vekigis kaj ŝin rigardis, li diris: «Jen, ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno». Kaj Dio diris: «Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon kaj aliĝos al sia edzino kaj ili estos unu karno». Kaj tiam iniciatiĝis la dia sakramento de la edziĝo, kies nodojn nur la morto povas disligi. Kaj tielan forton kaj efikon havas ĉi mirakla sakramento, ke, per ĝi, du diferencaj personoj fariĝas unu sola karno; kaj eĉ pli: en la okazoj kiam la geedzoj vivas en harmonia agordo, ili ja posedas du animojn, sed nur unu volon. Do la karno edzina estas ankaŭ la edza, kaj se makuloj falas sur ĝin, aŭ se la edzino lasas, ke ĝi difektiĝu, tiam la karno de la edzo ricevas la samajn damaĝojn, kvankam li, kiel dirite, pri nenio kulpus. Same kiel la tuta korpo sentas la doloron de piedo aŭ de alia membro, ĉar temas pri unu sola karno, kaj la kapo sentas la doloron de maleolo, sen mem kaŭzi la doloron, tiel same la edzo dividas kun la edzino ŝian senhonorigon, ĉar li kaj ŝi estas nur unu persono. Nu, la honoroj kaj infamioj de ĉi mondo devenas de la karno kaj de la sango, do ankaŭ la infamioj de adulta edzino havas la saman originon, kaj sekve parto de ili neeviteble falas sur la edzon, kaj oni lin konsideras senhonorigita, eĉ se tion li ne scias. Pensu, Anselmo, ke vi metus vin en danĝeron, dezirante perturbi la pacon de via bona edzino; pensu ankaŭ, ke vi agitus per vana kaj stulta scivolo la pasiojn, kiuj nun dormas en la brusto de via ĉasta edzino; rimarku, ke vi povas gajni apenaŭ ion, sed perdi tiel multe, ke mankas al mi esprimoj por priskribi la perdon. Nu, se ĉio, kion mi diris, ne sufiĉas por deturni vin de via malica intenco, bonvolu serĉi aliloke la instrumenton de via misfortuno kaj de via senhonorigo, ĉar

mi ne ludos tian rolon, eĉ se mi suferos la plejan misfortunon imageblan: la pardonon de via amikeco.

Dirinte tion, la saĝa kaj virta Lotario silentis, kaj Anselmo, enpena kaj konfuzita, ne povis respondi dum kelka tempo eĉ unu solan vorton; sed fine li diris:

—Vi vidis, kara Lotario, kiel atente mi aŭskultis vin. Viaj argumentoj, ekzemploj kaj komparoj pruvas la grandon de via saĝo kaj la sinceron de via amikeco. Mi vidas ankaŭ, kaj konfesas, ke se mi sekvos, ne vian opinion, sed la mian, mi fuĝos de la bono por persekuti la mavon. Kvankam mi tiel pensas, konsideru tamen, ke mi suferas nun la saman afekcion troveblan en iaj virinoj, kiuj kapricas manĝi pecojn de tero, gipso, karbo kaj aliaj pli naŭzaj substancoj, abomenaj al la okuloj, kaj eĉ pli do al la palato. Do, necesas trovi procedon por resanigi min, kaj tion ni povus facile fari, se vi jam komencus amindumi Camilan, eĉ nesincere kaj sen granda ardo. Ŝi ne estas tiel fragila, ke ŝia pudoro falus teren ĉe la unua atako. Mi sentus min kontenta per tia komenco, kaj vi plenumus la devon truditan de nia amikeco, ne nur redonante al mi la vivon, sed konvinkante min, ke mi sekure konservas mian honoron. Vi devas min komplezi eĉ se nur pro unu konsidero: pro tio, ke mi estas plene decidita entrepreni ĉi aferon, kaj certe vi ne lasus min konfidi mian obsedon al alia persono, kio endanĝerigus la honoron, kies pardonon vi volas eviti. Rilate al Camila, apenaŭ gravas, ĉu ŝi erare juĝos vian reputacion, dum vi ŝin amindumos, ĉar post tempo, konstatante, ke ŝi estas tiel firma, kiel ni esperas, vi povos diri al ŝi la veron kaj retrovi vin en ŝia estimo en la sama loko kiel antaŭe. Kaj tial, ke, apenaŭ vin riskante, vi povos doni al mi tiel multe da feliĉo, bonvolu fari la taskon, eĉ se vi renkontos kelke da komplikoj, ĉar, kiel dirite, jam per la komenco mi konsideros la aferon finita.

Ĉe tiel granda obstino de Anselmo, Lotario ne sciis, per kiaj novaj ekzemploj aŭ argumentoj kontraŭdiri lin; kaj, ĉar lia amiko minacis konfidi sian malican planon al alia persono, Lotario decidis, por eviti mavon ankoraŭ pli grandan, cedi al la petoj de Anselmo, sed kun la sekreta intenco klopodi kontentigi Anselmon, sen perturbi la spiritan pacon de Camila. Li do petis Anselmon komuniki al neniuj sian planon, kaj promesis surprizi la taskon kaj komenci ĝin, kiam Anselmo volos. Anselmo brakumis lin tenere kaj ame kaj dankis lin pro ties sinofero, kvazaŭ Lotario estus farinta al li gravegan favoron. Ili interkonsentis komenci la taskon jam de la sekvanta tago; Anselmo donus al li tempon kaj okazon paroli duope kun Camila kaj provizus lin per mono kaj juveloj, por ke li regalas ŝin per ili. Anselmo konsilis al li serenadi ŝin kaj skribi versojn je ŝia laŭdo, kaj diris, ke, se Lotario ne volus fari al si la klopodon ilin komponi, li mem ilin verkus. Lotario promesis fari ĉion, sed ne aldonis, ke ne kun la intenco, kiun imagis lia amiko; tiel interkonsentinte, ili iris al la domo de Anselmo, kie ili trovis Camilan plena de angoro kaj timo pro la prokrasto, pli longa ol ordinare, de ŝia edzo.

Anselmo fine adiaŭis sian amikon, kaj tiel grandis lia kontento, kiel grandis la embaraso de Lotario, kiam irante al sia hejmo, li ne sciis, kiel li povus eltiri sin el tiel stulta afero. Sed en la nokto li elpensis la manieron ŝajne sekvi la planon de Anselmo sen ofendi Camilan. La sekvantan tagon li iris manĝi al sia amiko, kies edzino ĉiam akceptis lin bonvole kaj afable, des pli, ke ŝi konis, kiel Anselmo intimis kun li. Kiam ili finis manĝi, kaj oni deprenis la tablotukon, Anselmo petis Lotarion akompani Camilan, ĉar li devis foriri trakti urĝan aferon kaj revenos post horo kaj duono. Camila petis lin ne foriri, kaj Lotario sin proponis por akompani lin, sed vane. Anselmo eĉ insistis al sia amiko, ke li atendu lin tie, ĉar poste li devas priparoli kun li aferon tre gravan, kaj rekomendis al Camila, ke ŝi ne lasu Lotarion sola, ĝis li

revenos. Nu, li simulis tiel bone la neceson, aŭ la sensecon, de sia foriro, ke oni ne povus imagi ĝin falsa.

Anselmo adiaŭis, kaj Camila sidis duope kun Lotario ĉe la tablo, ĉar la geservistoj de la domo jam eliris manĝi. Lotario vidis sin, kiel Anselmo deziris, en la kampo de batalo, fronte al homo kapabla venki per nur ties belo tutan skadron de armitaj kavaliroj. Konsideru do, ĉu Lotario ne havis motivon timi tian homon! Sed li nur metis la kubuton sur brakon de la fotelo kaj la vangon sur sian manon, kaj, petinte pardonon al Camila pro siaj tro familiaraj manieroj, diris, ke li deziras iom ripozi ĝis la reveno de Anselmo. Camila respondis, ke li ripozus pli bone en la *estrado*^[144] kaj petis lin eniri tien por dormi. Sed Lotario rifuzis la proponon kaj, dormiĝinte en la fotelo, tie sidis, ĝis Anselmo revenis. Ĉi lasta, vidante, ke Camila troviĝas en sia ĉambro, kaj ke Lotario dormas, pensis, ke pro lia longa prokrasto, la paro havis tempon ne nur por paroli, sed eĉ por dormi; do li tre senpacience atendis la vekiĝon de Lotario por eliri kun li al la strato demandi kiel prosperis al li la afero.

Ĉio okazis, kiel li anticipis. Lotario vekiĝis, poste ili du eliris el la domo, Anselmo pridemandis, kaj lia amiko respondis, ke ne ŝajnis al li konvene lanĉi la tutan atakon jam en la unua fojo, kaj, ke, sekve, li limiĝis laŭdi la belon de Camila, dirante al ŝi, ke en la tuta urbo oni parolas nur pri ŝia ĉarmo kaj saĝo. Lotario informis al Anselmo, ke tion li opinias bona komenco por gajni ŝian konfidon kaj por inklinigi ŝin aŭskulti lin kun plaĉo la sekvantan fojon. Tian sistemon uzas la diablo, kiam li volas trompi homon, kiu sin tenas avertita kontraŭ li: kvankam li estas anĝelo de tenebro, li sin transformas en anĝelon de lumo kaj sub vualo de virto delogas la homon, antaŭ ol riveli ĉe la fino sian veran karakteron. Kaj se en la komenco mem oni ne rekonas lian trompon, la diablo ordinare sukcesas per ĉi artifiko.

Anselmo tre kontentis kaj diris, ke, eĉ se li ne elirus el sia domo, li donus al sia amiko la saman ŝancon ĉiutage, ŝajnigante sin tiel okupata per aliaj aferoj, aliloke en la hejmo, ke Camila nenion suspektus. Nu, pasis multaj tagoj, kaj Lotario diris ankoraŭ nenion al Camila, sed asertis al Anselmo, ke, malgraŭ sia amindumado, li rimarkis en ŝi nenian inklinon cedi al io riproĉinda kaj eĉ ne la plej etan signon de intereso, kaj, ke, kontraŭe, ŝi minacis lin, dirante, ke, se li insistus en sia malica klopodo, ŝi rakontus ĉion al sia edzo.

—Tre bone —diris Anselmo—. Ĝis nun, Camila rezistis al vortoj; necesas vidi, kiel ŝi rezistos al konkretaj logaĵoj. Morgaŭ mi provizos vin per du mil oraj eskudoj, kaj vi proponos, kaj eĉ donos, ilin al ŝi; krome vi ricevos ankaŭ du mil aliajn por aĉeti juvelojn kaj tenti ŝin per ili. La virinoj, speciale la belaj virinoj, kiom ajn ĉastaj ili estas, tre amas montri sin ĉarmaj kaj elegantaj, kun juveloj kaj en riĉaj kostumoj, kaj se Camila rezistos al ĉi tento, mi kontentiĝos kaj ne plu ĝenos vin.

Lotario respondis, ke, ĉar li komencis, li iros ĝis la fino, kvankam li certis, ke li elpaŝos laca kaj venkita el la entrepreno. La sekvantan tagon li ricevis la kvar mil eskudojn kaj, kune kun ili, kvar mil embarasojn, ĉar li ne sciis kion novan diri por mensogi; fine li decidis sciigi al Anselmo, ke Camila tiel firme rezistas al la donacoj kaj promesoj, kiel al la vortoj, kaj ke ne valoras plu laciĝi tempoperde. Sed la fato gvidis la aferon alie, ĉar, foje, Anselmo, lasinte Camilan kaj Lotarion solaj, kiel en aliaj okazoj, sin ŝlisis en ĉambro kaj tra la truo de la seruro observis kaj aŭskultis la paron. Kiam li vidis, ke laŭlonge de pli ol duonhoro Lotario diras al Camila eĉ ne unu vorton, kaj ke li tiel tenus sin eĉ laŭlonge de tuta jarcento, Anselmo komprenis, ke la sciigoj de lia amiko rilate al la reagoj de Camila estis nuraj fikcioj kaj mensogoj. Sed, por ankoraŭ pli

certiĝi, Anselmo eliris el la ĉambro, vokis Lotarion flanken kaj demandis al li, ĉu li havas ion novan por rakonti, kaj kia estas la humoro de Camila. Lotario respondis, ke li pensas ne plu okupiĝi pri la afero, ĉar Camila reagis tiel akre kaj seke, ke li ne kuraĝus sin turni al ŝi denove.

—Ho Lotario, Lotario! —diris Anselmo—. Kiel aĉe vi plenumas vian vorton, kaj kiel aĉe vi reciprokas mian grandan konfidon al vi! Mi ĵus observis vin tra la serur-truo de ĉi ŝlosilo kaj vidis vin diri eĉ ne unu solan vorton al Camila, kio igas min pensi, ke tute nenion vi diris al ŝi de la komenco. Se efektive tiel (kaj mi ne dubas, ke fakte tiel estas), kial vi trompas min? Kial vi volas preni de mi, per via artifiko, la eblon trovi kion mi deziras?

Anselmo ne plu parolis, sed liaj vortoj sufiĉis por meti lian amikon en embarason kaj konfuzon; ĉar oni lin surprizis en evidenta mensogo, Lotario, sentante sin preskaŭ senhonorigita, ĵuris al Anselmo, ke de tiu momento, li surprenas la taskon kontentigi lin sen diri mensogojn, kion oni konstatus, se oni kaŝe lin observus de nun. Tamen Anselmo ne bezonus ĝeni sin per tio, ĉar Lotario tiel efektivigus la taskon, ke li liberigus sin de ĉia suspekto kaj plene kontentigus sian amikon. Anselmo lin kredis, kaj, por doni al li pli sekuran kaj daŭran okazon, decidis forlasi la hejmon por ok tagoj kaj pasigi ilin ĉe amiko loĝanta en vilaĝo ne tre dista de la urbo. Li aranĝis ankaŭ, ke ĉi amiko urĝe voku lin, tiel, ke li povu doni al Camila kontentigan pretekston por sia foriro.

Kompatinda, stulta Anselmo! Kion vi faras? Kion vi celas? Kion vi komicias? Pensu: vi vin turnas kontraŭ vi mem, aranĝas vian propran infamion kaj vin puŝas al via perdiĝo. Via edzino Camila estas virta; vi ŝin posedas en paco kaj sekuro; neniuj sin trudas en viaj plezuroj; ŝiaj pensoj flugas nur inter la muroj de ŝia domo; vi estas al ŝi la ĉielo en la

tero, la celo de ŝiaj deziroj, la personiĝo de ŝiaj gustoj, kaj la mezurilo de ŝia volo, ĉar ŝi ĉiam adaptiĝas al la via kaj al la ĉiela. Nu, la mino de ŝia honoro, belo, virto kaj modesto donas, sen ia laboro de via flanko, la tutan riĉon, kiun vi povus deziri. Kial do vi volas fosi la teron kaj serĉi freŝan vejnon de nova kaj nekonata trezoro, metante vin en la danĝeron de disfaloj, se konsideri, ke tia mino sin apogas sur la ne tre firmaj traboj de ŝia fragila naturo? Memoru, ke la ebloj povas prave rifuzi doni sin al la serĉanto de neebloj, kiel iu poeto bele diris:[\[145\]](#)

Vivon serĉas mi en morto,
lojalecon en perfido,
prodigemon en avido,
energion en malforto
kaj flekseblon en rigido.
Sed la fat', nesimpatia,
diris, de la sfero dia,
ke, ĉar mi neebulon ĉasas,
la ĉielo ja ne lasas,
ke la eblo estu mia.

La sekvantan tagon Anselmo iris al la vilaĝo, dirinte al Camila, ke, dum lia foresto, Lotario venos por zorgi super la domo kaj por manĝi kun ŝi, kaj ke ŝi traktu Lotarion, kiel lin mem. Ĉar prudenta kaj honesta, Camila afliktiĝis pro la ordono de sia edzo, kaj petis lin konsideri, ke ne ŝajnus dece, ke, dum li forestas, alia persono sidus sur lia seĝo. Ŝi aldonis, ke se tion li disponis, ĉar li ne konfidis ŝian kapablon mastrumi la domon, ĉi-foje li devus doni al ŝi tian ŝancon kaj vidus propraokule, ke ŝi taŭgas, ne nur por tio, sed eĉ por pli komplikaj taskoj. Anselmo respondis, ke, ĉar tio estas lia volo, ŝi devas nur klini la kapon kaj obei. Camila promesis observi lian deziron, sed ne volonte. Anselmo foriris, Lotario venis al ŝi la sekvantan tagon, kaj Camila lin akceptis per afabla, sed prudenta bonvolo, ĉar ŝi zorgis, ke Lotario

neniuokaze restu sola kun ŝi: ŝin ĉirkaŭis ĉiam ŝiaj geservistoj, speciale ŝia ĉambristino Leonela, kiun ŝi tre amis, ĉar de iliaj infanaj jaroj ambaŭ kunvivis ĉe la gepatroj de Camila, kaj, kiam ŝi edziĝis al Anselmo, ŝi prenis Leonelan kun si al sia nova hejmo.

Dum la tri unuaj tagoj Lotario diris al ŝi tute nenion, kvankam ne mankis al li la okazo, kiam, depreninte la tablotukon, la geservistoj eliris por manĝi, eĉ se la manĝon ili konsumis dum nur tempeto, sekvante la instrukciojn de Camila, por tuj reveni. Camila eĉ disponis, ke Leonela manĝu pli frue, por ke ŝi ĉiam akompanu ŝin en la ĉeesto de Lotario. Sed la ĉambristino, kies pensoj okupiĝis per aliaj agrablaĵoj, bezonis tiun tempon por sin doni al siaj plezuroj, kaj ne plenumis ĉiufoje la ordonon de sia sinjorino; male, ŝi ofte lasis ilin solaj, kvazaŭ ŝi sekvus ies instrukciojn. Tamen la nobla figuro de Camila, la sereno de ŝia vizaĝo kaj la digno de ŝia tuta persono tute bridis ankoraŭ la langon de Lotario.

Sed, se tion bonan atingis la multaj virtoj de Camila, trudante silenton al la lango de Lotario, la bono turniĝis en damaĝon por ili ambaŭ, ĉar, se la lango silentis, la pensoj ne haltis, kaj Lotario havis tempon admiri, unu post alia, ĉiun ĉarmon fizikan kaj moralan de Camila; kaj ili estis tiaj, ke ili povus inspiri amon, ne nur al koro el karno, sed eĉ al statuo el marmoro. Lotario rigardis ŝin dum la tuta tempo en kiu li devus paroli, kaj pensante, kiel ege aminda ŝi estas, li iom post iom perdis la ŝuldatan respekton al Anselmo. Mil fojojn li volis foriri al loko, kie neniam Anselmo vidus lin, nek li Camilan; sed jam la plezuro ŝin rigardi detenis lin de tia intenco. Li luktis kaj batalis kontraŭ si mem por detrui kaj ne senti la plezuron admiri Camilan. Kiam sola, li kulpigis sin mem pro sia frenezo, nomis sin perfida amiko kaj eĉ mava kristano. Sed fine li konkludis, komparante sin kun Anselmo, ke la frenezo kaj naivo de lia amiko pli riproĉindas ol lia propra lojalrompo, kaj ke, se li havus antaŭ la okuloj de Dio

tiel bonan ekskuzon por sia konduto, kiel antaŭ la okuloj de la homoj, li ne timus la punon al sia kulpo.

Okazis do, ke la belo kaj bono de Camila, kombinitaj kun la ŝanco, kiun la stulta edzo metis en la manojn de Lotario, plene dispelis ties skrupulojn. Dum la tri tagoj sekvantaj al la foriro de Anselmo, Lotario senĉese batalis kontraŭ siaj impulsoj, sed fine, atentante nur sian pasion, komencis amindumi Camilan kun tiom da ardo kaj impeto, ke ŝi, ŝokita, stariĝis kaj sin retiris en sian ĉambron, sen respondi eĉ unu solan vorton. Sed, ĉar la espero ĉiam akompanas la amon, la fervoro de Lotario ne velkis ĉe ŝia frida reago, sed eĉ pli intensiĝis. De sia flanko, Camila, vidante en Lotario kion ŝi neniam imagus, sentis sin tute embarasita. Sed, ĉar ŝajnis al ŝi, ke estus nek dece, nek konvene, doni al Lotario novan okazon paroli, ŝi sendis al Anselmo tiun saman nokton unu el siaj servistoj kun la jena mesaĝo:

[138] La Saĝulo estas la biblia Salomono. Ĉi tie oni aludas al *Sentencoj* 31,10: «Se iu trovis kapablan virinon, ŝia valoro estas pli granda ol perloj».

[139] Latine: «ĝis la altaro», t.e. nur en bonaj kaj honestaj entreprenoj. Tion diris Plutarko, ne ia poeto, kiel Cervantes erare citas.

[140] Itala poeto, mortis ĉirkaŭ 1570. Oni diras, ke li laboris 24 jarojn komponante la poemon *Larmoj de Sankta Petro*.

[141] Rakontas Ariosto en sia *Rolando*, ke iu kavaliro, amiko de Reinaldos, donacis al li glason, kiu havis la kapablon riveli al la edzoj, ĉu ties edzinoj trompis ilin. Cervantes sin inspiris en kelkaj partoj de Rolando por verki la novelon pri la stulta scivolo.

[142] Cervantes eble aludas al iu el siaj perditaj komedioj, eble al la titolita *La Confusa*.

[143] Danaa, amantino de Zeŭso, kiu ŝin gravedigis alpreninte la formon de orpluvo.

[144] Hispane, ĉambro kie la virinoj sidiĝis sur surplankaj kusenoj kaj akceptis la vizitantojn.

[145] Eble Cervantes mem. Li kutimis citi sin, sen mencii sian nomon.

Ĉapitro 34

Kun la daŭrigo de la novelo pri la stulta scivolo

Oni kutime diras, ke armeo sen generalo kaj kastelo sen mastro mave impresas, kaj mi aldonas, ke eĉ pli mave impresas juna edzino sola, kiam la edzon retenas for de ŝi ne plej urĝaj aferoj. Mi sentas min tiel malbone sen vi, kaj tiel nekapabla elporti vian foreston, ke se vi ne tuj revenos, mi iros al miaj gepatroj, eĉ se via hejmo restos negardata. Ĉar la gardanto, kiun vi lasis al mi —se li estas ĉi tie en tia karaktero— pli zorgas pri siaj propraj plezuroj ol pri viaj intereso. Kaj, ĉar vi estas prudenta, mi nek bezonas, nek devas plu diri.

Kiam Anselmo legis ĉi leteron, li komprenis, ke Lotario jam komencis la entreprenon, kaj ke Camila sendube reagis kiel esperate. Tiel do, plena de ĝojo ĉe tia novaĵo, li respondis al Camila per parola mesaĝo, ke ŝi nenial lasu la domon, ĉar li revenos tre baldaŭ. La respondo de Anselmo ŝin konsternis, kaj ĵetis ŝin en konfuzon pli grandan ol iam antaŭe; ŝi kuraĝis nek resti hejme, nek iri al siaj gepatroj, ĉar restante, ŝi endanĝerigus sian honoron, kaj forirante, ignorus la ordonon de sia edzo. Ŝi fine solvis la alternativon, prenante la pli eraran decidon, nome, resti hejme kaj ne eviti Lotarion, por ne doni al la geservistoj motivon de klaĉoj. Camila nun bedaŭris, ke ŝi skribis la mesaĝon al sia edzo, ĉar ŝi timis, ke Anselmo povus pensi, ke Lotario rimarkis en ŝi ian nedecan koketemon, kiu lin movis ignori la respekton al ŝi ŝuldatan. Sed Camila, metante sian fidon je Dio kaj je sia virto, pensis trovi la forton sufiĉan por rezisti en silento la amindumadon de Lotario, kaj decidis diri nenion pli al sia edzo pri la afero, por eviti al li zorgojn aŭ motivojn de kvereloj. Ŝi eĉ pensis,

kiel ŝi povus senkulpigi Lotarion antaŭ Anselmo, kiam ŝi lasta demandus al ŝi pri la kialo de ŝia mesaĝo.

Kun ŝi decido pli laŭdinda ol saĝa, la sekvantan tagon ŝi aŭskultis Lotarion, kaj tiel arde kaj konvinke li parolis, ke Camila apenaŭ povis eĉ per sia tuta virto, evitigi al siaj okuloj riveli la aman kompaton vekitan en ŝia brusto de la larmoj kaj vortoj de Lotario. Fine ŝajnis al li necese profiti la foreston de Anselmo, do li intensigis la sieĝon kontraŭ la fortreso, laŭdante ŝian belon, ĉar nenio konkeras kaj renversas pli rapide la citadelon de belulina vanto, ol ŝi vanto mem eldirita per flatema lango. Efektive, tiel fervore kaj per tiaj materialoj li minis la kastelon de ŝia virto, ke same ŝi falus, eĉ se ŝi estus tute el bronzo. Lotario ploris, petegis, promesis, kaĵolis kaj ĵuris kun tiom da ardo kaj kun tielaj montroj de sincera pasio, ke li supervenkis la pudoron de Camila kaj atingis la triumfon, kiun li plej deziris, sed apenaŭ atendis.

Camila cedis. Jes, ŝi cedis. Sed kial miri, se oni konsideras, ke la amikeco de Lotario ne povis teni sin firma? Jen klara pruvo, ke oni povas venki aman pasion, nur se oni forkuras de ĝi, kaj ke vanas batali kontraŭ tiel potenca malamiko, ĉar nur per fortoj diaj oni povas submeti la forton de la karno. Nur Leonela sciis pri la sinforĝeso de sia sinjorino, ĉar la perfidaj geamantoj ne povis kaŝi sin antaŭ la ĉambristino. Lotario volis riveli al Camila nek la planon de Anselmo, nek tion, ke ŝi lasta donis al li okazon alveni ĝis la fino de la vojo, ĉar li timis, ke alie ŝi ne estimus lian amon kaj pensus, ke li amindumis ŝin, ne sincere, sed laŭplane kaj iel hazarde.

Post kelkaj tagoj Anselmo revenis al sia hejmo, kaj ne perceptis la mankon de io, kion li plej estimis kaj tamen tute neglektis. Li tuj iris vidi Lotarion, trovis lin hejme, kaj post ol ili brakumis unu la alian, li demandis al Lotario, ĉu ties sciigoj donos al li la vivon aŭ la morton.

—Miaj sciigoj, amiko Anselmo, estas, ke via edzino meritas la nomon de ekzemplo kaj krono de ĉiuj bonaj virinoj. Miaj vortoj perdiĝis en la aeron; ŝi disdegnis la promesojn, rifuzis la donacojn, kaj pri kelkaj falsaj larmoj miaj ŝi tre mokis. Unuvorte, Camila estas ne nur la kulmino de ĉia belo, sed trezoro, kie sidas honoro, prudento, pudoro, kaj la ceteraj virtoj, kiuj donas al honestulino feliĉon kaj senmakulan reputacion. Jen, reprenu vian monon, amiko, mi ne bezonis tuŝi ĝin, ĉar Camila havas tro puran animon por cedi al aferoj tiel mizeraj kiel donacoj kaj promesoj. Kontentiĝu do, Anselmo, ne faru pli da provoj, kaj, ĉar, transirante per sekaj piedoj ĉi maron da malfaciloj, vi dispelis la suspektojn, kiujn pri la virinoj oni povas kaj devas havi, ne enpaŝu refoje, en la profundan maron de novaj angoroj, nek provu pere de alia piloto la bonon kaj forton de la ŝipo, kies posedon donis al vi la sorto, por ke ĝi vin portu sur la maroj de ĉi mondo. Vi jam troviĝas en sekura haveno, tiel do plifirmiĝu per la ankro de la bona reputacio, kaj tie sidu, ĝis oni petos de vi, ke vi liberiĝu de la ŝuldo, de kies pago nenia privilegio vidas sin libera.

Anselmo tre kontentis ĉe la vortoj de Lotario kaj kredis lin, kvazaŭ parolus orakolo. Tamen li petis sian amikon ne forlasi ankoraŭ la entreprenon, eĉ se ili ĝin rigardus nur kiel motivon de distro kaj scivolo, aldonante, ke ne necesus klopodi en la futuro tiel persiste kiel ĝis nun. Li deziris nur, ke lia amiko Lotario skribu kelke da versoj je ŝia laŭdo, sub la nomo de Clori, kaj li, Anselmo, dirus al Camila, ke Lotario enamiĝis al damo, al kiu li donis la menciitan nomon por skribi pri ŝi kun la deco ŝuldata al ŝia honoro. Kaj se Lotario ne volus fari al si la klopodon skribi la versojn, li mem ilin komponus.

—Ne estas necese —respondis Lotario—. La muzoj montras sin indulgaj al mi, tiom, ke ili min vizitas kelke da fojoj en la jaro. Diru al Camila kion vi elpensis pri mia fikcia am-afero,

kaj mi skribos la versojn. Certe ili ne vidiĝos tiel bonaj kiel meritas la subjekto, sed mi faros almenaŭ mian plejblon.

Tiel interkonsentis la amiko perfida kun la stulta. Kaj kiam Anselmo revenis hejmen, li demandis al Camila, kial ŝi sendis la mesaĝon al li. Ŝi jam miris, ke li ne faris antaŭe tian demandon, kaj ŝi respondis, ke ŝajnis al ŝi, ke Lotario rigardis ŝin iom pli senĝene ol kiam Anselmo troviĝis en la domo; sed, ke ŝi pensas nun, ke ŝi trompiĝis, kaj ke temis pri iluzio de ŝia flanko, ĉar Lotario evitas renkonti ŝin kaj troviĝi sola kun ŝi. Anselmo diris tiam, ke ŝi prave pensas, ĉar li scias, ke Lotario enamiĝis al nobela pucelo de la urbo, kaj ŝin prikantas sub la nomo de Clori. Krome, Anselmo aldonis, ke eĉ se ne ekzistus tia enamiĝo, oni ne devus pridubi la lojalon de Lotario kaj la sinceron de lia granda amikeco. Nu, se Lotario ne estus avertinta al Camila, ke lia amo al Clori estas nura fantazio, kaj ke li mem sciigis pri ĝi al Anselmo por tiel havi la eblon dediĉi kelkan tempon skribi versojn je la laŭdo de Camila, ŝi sendube falus en la desperigan reton de la ĵaluzo; sed, ĉar Lotario ŝin antaŭavertis, ŝi aŭskultis sen ajna zorgo la sciigon de Anselmo.

La sekvantan tagon, kiam ili tri sidis ĉe la tablo, Anselmo petis, ke Lotario deklamu kelkajn el siaj versoj dediĉitaj al sia amata Clori, kaj ke, konsiderante, ke Camila ne konas ŝin, li povas diri pri ŝi kion li volas.

—Eĉ se ŝi konas ŝin —respondis Lotario—, nenion mi kaŝus; ĉar, kiam amanto laŭdas sian damon kaj riproĉas al ŝi ties kruelon, nenian ofendon li faras al ŝia reputacio; nu, kiel ajn ĝi estas, la jenan soneton mi komponis hieraŭ je la sendankemo de ĉi Clori:

En la silento de la nokto paca,
kiam la homoj dolĉadorme kuŝas,
la vean triston mian mi elbuŝas

al Clori kaj al la ĉielo gracia.

Kaj dum la hela suno ombro-ĉasa
tra rozaj pordoj de aŭror' sin puŝas,
lamentojn, plendojn, veojn re akuŝas
la tristo mia kun dolor' senlaca.

Kaj dum la suno de brilanta oro
de alte lumon sur la mondon sendas,
ankoraŭ frapas min aflikto murda.

Revenas nokto, min opresas ploro,
ĉar ĉiam la animon mian fendas
disdegna Clori kaj ĉielo surda.

La soneto plaĉis al Camila, sed eĉ pli al Anselmo; li tre laŭdis ĝin kaj diris, ke tro kruelas damo, se ŝi ne cedas al tiel evidentaj veroj. Camila komentis al tio:

—Ĉu la amantaj poetoj ĉiam diras la veron en siaj poemoj?

—Kiel poetoj, ne —respondis Lotario—, sed kiel amantoj ili ne sukcesas esprimi la tutan forton de sia amo.

—Sendube —diris Anselmo, dezirante apogi la opinion de Lotario antaŭ Camila, kiu havis nenian suspekton pri la plano de Anselmo kaj jam enamiĝis al Lotario.

Sekve, ĉar ŝin plezurigis ĉio lia, kaj ĉar, krome, ŝi sciis, ke liaj deziroj kaj versoj celas ŝin, kaj ke ŝi estas la vera Clori, ŝi petis lin deklami alian poemon aŭ soneton, se li ĝin memorus.

—Jes, mi memoras alian —respondis Lotario—, sed mi pensas, ke ĝi estas ne tiel bona kiel la unua, aŭ, pli ĝuste, ke ĝi estas iom pli mava. Sed vi mem juĝu; jen la soneto:

Sendankulin', mortante mi konfesos,
ke mi preferas morti kaj, missorta,
ĉe la piedoj viaj kuŝi morta.
Ne pentas mi: vin ami mi ne ĉesos.

Mi mortos, jes, kaj oni min forgesos
senflora, senfavora, mizerporta.
Sed belon vian, mi, per streko forta
en mian bruston poreterne presos.

Relikve vivos ĝi, ĝis morto hanta
alvenos, akcelata de l' amaro
vin ami sen konsolo kaj espero.

Ho, ve al homo blinde naviganta
en nokto nigra, sur tempesta maro,
sen ŝirma rodo kaj sen gvida stelo.

Anselmo laŭdis ankaŭ ĉi soneton, same kiel la unuan; kaj tiel, li forĝis, eron post ero, la ĉenon, kiu ĉiufoje pli implike lin alligis al la infamio, ĉar, ju pli Lotario senhorigis lin, des pli honorata li sin vidis. Kaj laŭmezure kiel Camila descendis al la abismo de sia fia peko, ŝi ascendis en la opinio de sia edzo al la pinto de la virto kaj de la bona reputacio. Foje Camila troviĝis sola kun la ĉambristino kaj diris:

—Mi hontas, kara Leonela, ke mi senvalorigis min, ĉar anstataŭ igi Lotarion aĉeti per pli longa pacienco la posedon de mia persono, mi donis min al li baldaŭ kaj volonte. Mi timas, ke li disdegno min pro la hasto de mia cedo, forgesante, kiel li sin trudis, ĝis li rompis ĉian reziston de mia flanko.

—Ne hontu pro tio, sinjorino —respondis Leonela—. Ne valoras la penon. Cedi baldaŭ ne signifas perdi valoron, se,

kion oni donas, tio bonas kaj estimindas. Kaj memoru, ke, laŭ la diro, kiu donas rapide, donas duoble.

—Oni diras ankaŭ —respondis Camila—, ke, kio apenaŭ kostas, apenaŭ valoras.

—Tio ne aplikeblas al vi —diris Leonela—, ĉar la amo, kiel mi aŭdis diri, foje flugas, foje paŝas; kun unuj ĝi kuras, kun aliaj lantias; al kelkaj donas fridon, kaj al kelkaj ardon; vundas kaj ekstermas; la pasio startas kuri en unu momento, kaj en la sama momento atingas la celon; en la mateno sieĝas fortreson kaj en la nokto ĝin konkeras, ĉar nenia forto rezistas al la amo. Se tiel do, kio vin alarmas kaj timigas? Certe la samo okazis al Lotario, kiam la amo profitis la foreston de la sinjoro, kiel instrumenton por vin venki. Ĉu la amo ne difinis al si planon plenumendan dum la foresto de Anselmo, por ke ties reveno ne kompromitu ĉion? La ŝanco estas la plej bona ministro de la amo por la efektivigo de ties deziroj. La amo uzas la ŝancon en ĉiuj siaj entreprenoj, speciale en ties komenco. La sperto, pli ol la teorio, instruis al mi pri kelkaj aferoj, kaj pri ili iam mi rakontos al vi, sinjorino: ankaŭ mi konsistas el karno kaj el juna sango. Cetere, sinjorino Camila, vi ne donis vin tiel baldaŭ, ĉar unue vi vidis en la okuloj, en la suspiroj, en la vortoj, en la promesoj kaj donacoj de Lotario, ties tutajn virtojn kaj animojn, kaj ke li estas vere inda je via amo. Ne lasu do, ke tiel skrupulaj kaj prudaj konsideroj torturu al vi la imagon, kaj ne dubu, ke Lotario amas vin, kiel vi lin; vivu do kontenta kaj feliĉa, ke vin kaptis la amo en la figuro de viro nobla kaj digna, posedanta, ne nur la kvar S, laŭdire proprajn al bonaj amantoj,^[146] sed eĉ plenan abocon. Aŭskultu, mi ĝin scias parkere. Ĉu li ne estas amanta, bona, ceremonia, ĉarma, diskreta, eminenta, firma, galanta, ĝentila, honesta, ideala, juna, kavalira, lojala, milda, nobla, oferema, prudenta, riĉa, nun la kvar S de la onidiro, kaj poste talenta, verdira kaj zorga pri via honoro?^[147]

Camila ridis je la aboco de sia ĉambristino kaj konkludis, ke Leonela scias pri la amo pli ol ŝi diris. Efektive, ŝi konfesis al Camila, ke ŝi rilatas kun bonfamilia junulo de la sama urbo, kio konsternis Camilan, ĉar ŝi timis, ke ŝia honoro povus endanĝeriĝi pro tia afero de Leonela. Ŝi urĝis la ĉambristinon diri, ĉu ŝi transiris la limon de la nuraj vortoj, kaj Leonela, sen ia honto kaj kun multa impertinento, respondis ke jes. Kiel sciante, la pekoj de sinjorino motivas la insolentiĝon de ŝiaj servistinoj, kiuj, vidante, ke la mastrino mispaŝas, tute ne zorgas mem lami, eĉ senkaŝe. Camila povis nur peti de Leonela, ke ŝi komentu kun sia amanto nenion pri ŝia intrigo, kaj ke ŝi tenu tre sekreta sian propran am-aferon, por ke Anselmo aŭ Lotario ne havu suspekton.

Leonela promesis tiel fari, sed ŝia maniero plenumi la promeson sufiĉis por konfirmi la timon de Camila, ke ŝi perdos sian reputacion pro la ĉambristino; efektive, kiam la aŭdaca Leonela vidis, ke la konduto de ŝia sinjorino montriĝas alia ol alitempe, ŝi havis la aplombon aperti al sia amanto la pordon de la domo por tie rendevui kun li, konfidante, ke, kvankam ŝia sinjorino lin vidus, ŝi kuraĝus diri nenion. Tia estas, efektive, unu el la mizeraj sekvoj de la pekoj de la damoj: ili sklaviĝas al siaj propraj servistinoj kaj sin devigas kaŝi ties senhontajn kaj friponajn farojn.

La samo okazis al Camila, ĉar, kvankam ŝi vidis multe da fojoj, ke Leonela troviĝas kun sia amanto en ĉambro de la domo, ŝi ne nur ne kuraĝis ŝin riproĉi, sed eĉ devis faciligi al ŝi la taskon kaŝi lin, por ke ŝia edzo ne havu la eblon lin surprizi. Sed fine, ŝi ne povis eviti, ke, foje, Lotario vidis lin eliri ĉe la matenruĝo. Komence li distingis nur nereconeblan ombron kaj imagis lin fantomo. Sed, vidante lin paŝadi kaj involvi sin ĝis la oreloj en la mantelon, li trovis sian ideon absurda, kaj falis en alian, kiu, dank' al Camila, ne kaŭzis ĉies pereon. Li ne pensis, ke la viro lasinta la domon de Anselmo en tiel stranga horo rendevuadis kun Leonela, ĉar li

eĉ ne memoris, ke ia Leonela ekzistas en la mondo; li kredis nur, ke se Camila facile kaj baldaŭ cedis al li, ŝi same volonte povus cedi al alia; efektive, la misagoj de perfida virino portas ankaŭ la sekvon, ke la viro mem, kies insistaj petoj kaj persvadoj puŝis ŝin cedi, perdas la konfidon je ŝi kaj kredas, ke ŝi eĉ pli facile donas sin al aliaj.

Ŝajnas, ke en ĉi momento Lotario perdis la prudenton, kaj ke liaj saĝaj rezonadoj forglitis el lia memoro, ĉar, sen ia logika, eĉ racia penso, senpacienca kaj blinda de furioza ĵaluzo lin voranta kaj de la obsedo sin venĝi kontraŭ Camila, li senplie iris al Anselmo, kiu ankoraŭ kuŝis en la lito, kaj diris al li:

—Sciu, Anselmo, ke jam de multaj tagoj mi batalas kontraŭ mi mem kaj faras al mi klopodojn por ne konfesi al vi kion nek eblas nek decas plu kaŝi. Sciu, ke la nekonkerebla Camila jam kapitulacis kaj pretas fari laŭ mia plaĉo; mi prokrastis riveli al vi ĉi fakton, nur por vidi, ĉu ŝi sentis nur simplan kapricon, aŭ ĉu ŝi intencis provi min kun la celo konstati, ĉu mia amindumado, entreprenita sub via permeso, havas firman kaj seriozan karakteron. Mi pensis ankaŭ, ke se Camila estus tia, kia ŝi devus esti, kaj kia ni ŝin opiniis, ŝi jam estus informinta vin pri mia amindumado. Sed tial, ke ŝi tion ne faris, mi konkludas, ke mi devas rigardi vera ŝian promeson, nome, rendevui kun mi (kiam vi denove forestos de la urbo) en la ĉambro, kie vi gardas la juvelojn —efektive, Camila ordinare akceptis lin tie—. Mi ne volas, ke vi ĵetu vin al hasta venĝo, ĉar la peko nur okazis en la penso, kaj povas esti, ke de nun ĝis la momento de la plenumo, Camila ŝanĝos sian intencon, lasante lokon nur al pento. Do, se konsideri, ke vi ĉiam sekvis tute aŭ parte miajn konsilojn, bonvolu sekvi nun la jenajn, por ke, antaŭ la atesto de viaj propraj okuloj kaj sen eblo de eraro, vi prenu la decidon al vi plej konvena kaj kontentiga: ŝajnigu, ke vi forestos du tri tagojn, kiel vi faris en aliaj okazoj, sed iel kaŝu vin en la menciita ĉambro, kies tapiŝoj kaj ceteraj objektoj donos al vi

taŭgan kovron; tiam vi kaj mi vidis propraokule kion Camila volas; kaj se ŝi evidentiĝos kulpa je perfido, kio estos ebla, sed ne certa, vi povos silente, singarde kaj diskrete venĝi vian senhonorigon.

Ĉe la vortoj de Lotario, Anselmo rigidiĝis de konsterno, miro kaj konfuzo, des pli, ke li tute ne atendis ilin aŭdi, ĉar li jam kredis, ke Camila venkis super la galantado de Lotario, kaj pro tio li komencis ĝui la gloron de ŝia triumfo. Anselmo, paralizita, tre longe silentis kun la okuloj senpalpebrume fiksitaĵoj al la planko, kaj fine respondis:

—Lotario, vi faris kion mi atendis de via amikeco. Mi plene sekvas vian konsilon; faru laŭvole, sed tenu sekreta, kiel decas, ĉi aferon tiel neatenditan.

Lotario tion promesis kaj adiaŭis, sed, apenaŭ li vidis sin sola, li profunde pentis kion li diris, kaj konfesis al si, ke li agis plej stulte, ĉar li povus venĝi sin kontraŭ Camila en maniero ne tiel kruela kaj fia. Li sin akuzis je stulto, malbenis sin pro sia hasta mispaŝo kaj ne sciis kion fari por ripari la fuŝon, aŭ por iel trovi taŭgan solvon al la situacio. Fine li decidis diri ĉion al Camila kaj, ĉar ne mankis al li okazoj ŝin renkonti, en tiu sama tago li trovis ŝin sola. Sed antaŭ ol li povus paroli, Camila diris:

—Sciu, kara Lotario, ke tia doloro premas al mi la koron, ke fine ĝi krevos en la brusto, se ne okazos ia miraklo. Nu, la insolento de Leonela iris ĝis la ekstremo, ke ŝi venigas ĉiunokte sian fianĉon al ĉi domo kaj restas kun li ĝis la tagiĝo, endanĝerigante mian reputacion, ĉar ajna persono, kiu vidus lin eliri je tiel nekutima horo, povus facile tiri sin al falsaj konkludoj. Sed plej ĉagrenas min, ke mi ne povas puni aŭ skoldi ŝin, ĉar la fakto, ke ŝi konas nian intrigon, bridas al mi la langon, devigas min silenti pri ŝia propra afero, kaj igas min timi, ke ĉio ĉi havos bedaŭrindan sekvon.

Kiam Camila komencis paroli, Lotario pensis, ke ŝi artifikas por kredigi al li, ke la viro, kiun li vidis eliri el la domo, estas ne ŝia amanto, sed la amanto de Leonela; sed, kiam li vidis ŝin plori, afliktiĝi kaj peti de li helpon, li fine kredis ŝin, kaj lin posedis profunda embaraso kaj rimorso. Tamen, li respondis al Camila, ke ŝi ne afliktiĝu, ĉar li trovos la manieron meti finon al la insolento de Leonela. Li rakontis ankaŭ kion, puŝate de furioza ĵaluz-atako, li diris al Anselmo, kaj kiel ili interkonsentis, ke ŝia edzo sin kaŝos en la ĉambro por spioni ŝin en evidenta fidelrompo. Li petegis ŝin pardoni al li tian frenezaĵon kaj konsili al li, kiel li povus ripari ĝin kaj trovi eliron el la implika labirinto, kien lia stulto metis lin.

Camila teruriĝis je la vortoj de Lotario kaj kun granda ĉagreno kaj pravaj riproĉoj admonis lin pro ties fia suspekto kaj indignis pro lia stulta plano; sed, ĉar la virino laŭnature posedas, tiel por la bono, kiel por la mavo, pli pretan talenton ol la viro (kvankam ĝi ne tiel brilas, kiam ŝi klopodas rezonadi), Camila tuj trovis la manieron ripari ĉi aferon ŝajne neripareblan. Ŝi diris al Lotario, ke li faru aranĝon, por ke Anselmo efektive sin kaŝu en la difinita ĉambro, ĉar, dank' al lia kaŝiĝo, ŝi havus la okazon krei la plej favoran situacion, por ke ili du ĝuu kune en la futuro sen timo al novaj alarmoj. Ŝi ne rivelis al li la tuton de sia plano, sed avertis lin, ke, post la kaŝiĝo de Anselmo, li devos sin prezenti, kiam Leonela lin vokos, kaj respondi al ŝiaj demandoj, ĝuste kiel li respondus, eĉ se li ne sciis, ke Anselmo aŭskultas. Lotario insiste petis ŝin sciigi al li sian tutan planon, tial, ke li povus fari pli senhezite kaj trafe ĉion konvenan.

—Ne —respondis Camila—. Ne necesas preni pli da antaŭzorgoj. Vi devos nur respondi, kiam mi demandas.

Camila ne volis antaŭtempe riveli al li sian intencon, ĉar ŝi timis, ke li ne trovos akceptinda ŝian planon, kiu tiel bona

ŝajnis al ŝi, kaj ke li serĉus aŭ alprenus alian ne tiel taŭgan.

Ĉe tio, Lotario foriris, kaj la sekvantan tagon Anselmo lasis sian domon sub la preteksto vojaĝi al la vilaĝo de sia kampara amiko; sed li tuj revenis kaj povis kaŝi sin, sen ia ĝeno, ĉar Camila kaj Lotario intence donis al li la okazon. Anselmo, jam kaŝita, sentis la intensan angoron imageblan en homo, kiu atendas vidi propraokule kaj detale la distranĉadon de sia honoro kaj tiel riskas perdi la senegalan trezoron, kiun li kredis posedi en sia amata Camila.

Jam tute certaj pri tio, ke Anselmo sidas kaŝite, Camila kaj Leonela eniris en la ĉambron, kaj, kiam ŝi faris tie unuan paŝon, Camila forte suspiris kaj diris:

—Ve, kara Leonela! Prefere ol plenumi mian intencon, kiun mi ne volas riveli al vi, por ke vi ne provu ĝin kontraŭstari, ĉu ne estus plibone, se vi puŝus ĉi ponardon de Anselmo en la perversan koron mian? Sed ne! Ne justas, ke mi suferu la punon pro la krimo de alia persono. Unue mi volas scii kion vidis ĉe mi la impertinentaj kaj lascivaj okuloj de Lotario, ke li kuraĝis evidentigi tiel kulpan pasion kontraŭ sia amiko kaj kontraŭ mia honoro. Iru al la fenestro, Leonela, kaj voku lin; sendube li staras en la strato, atendante plenumi sian malican projekton. Sed unue mi plenumos la mian, kruelan sed honorindan.

—Ve, sinjorino! —respondis la ruza kaj komplica Leonela—. Kion vi volas fari per la ponardo? Ĉu preni de vi la vivon, aŭ preni la vivon de Lotario? Ĉiuokaze vi damaĝus vian honoron kaj reputacion. Prefere kaŝu vian rankoron kaj ne donu al tiel freneza viro la okazon eniri nun en la domon kaj trovi nin solaj. Ne forgesu, ke ni estas feblaj virinoj, kaj li, viro de firma rezoluteco; kaj, ĉar li venus blinda de pasio, puŝate de sia perversa intenco, eble li povus fari al vi ion pli hororan ol preni de vi la vivon, antaŭ ol vi efektivigus vian propran

projekton. Honton al sinjoro Anselmo, kiu tiel libere lasis la friponon en sian domon! Kaj se, kiel mi pensas, vi mortigos lin, kion ni faros kun li senviva?

—Kion? —respondis Camila—. Ni lasos, ke Anselmo lin enterigu, ĉar certe li sentos agrabla la laboron meti sub la teron sian propran infamion. Nu, voku lin; kun la paso de ĉiu momento prokrastiĝas la plenumo de la ĝusta venĝo kontraŭ la ofendo farita al mia digno, kaj ŝajnas kreski en mi ia sento de kulpo, kvazaŭ mi ne observus la fidelon de mi ŝuldatan al mia edzo.

Ĉion ĉi aŭskultis Anselmo, kaj ĉiu vorto de Camila frapis al li en la cerbon. Sed aŭdante, ke ŝi pretas mortigi Lotarion, li volis eliri de sia kaŝejo kaj montri sin por eviti la krimon; tamen, lin detenis la deziro vidi kion fine kapablos tiel kuraĝa kaj honesta rezoluteco, kaj decidis, ke li aperos nur en la ĝusta momento por oponi al eventuala atenco neriparebla.

Ĉe tio Camila eksvenis, ĵetis sin sur liton tie starantan, kaj Leonela komencis amare plori, dirante:

—Ve al mi! Kia misfortuno, se inter miaj brakoj mortus la floro de la monda virto, la krono de la virinoj, la ĉasto mem en persono!

Kaj ŝi diris tiel multe da vortoj de simila stilo, ke ajna homo ŝin aŭdanta konsiderus ŝin la plej afliktita kaj lojala ĉambristino de la mondo, kaj ŝian sinjorinon alia nova kaj persekutata Penelopa. Camila baldaŭ vekiĝis el sia sveno kaj, denove konscia, diris:

—Leonela, kial vi ne iris voki la plej perfidan amikon, kian ĝis nun ne vidis la suno nek kaŝis la nokto? Iru do, rapide, kuru, hastu! Ne lasu, ke la prokrasto estingu en mi la fajron

de la kolero kaj solvu en minacojn kaj malbenojn la ĝustan venĝon, kiun mi atendas.

—Mi jam iras voki lin, sinjorino —diris Leonela—, sed unue donu al mi la ponardon, ke en mia foresto vi ne faru ion tiel teruran, ke ni, la personoj vin amantaj, plorus dum la cetero de nia vivo.

—Ne timu, kara Leonela —respondis Camila—, mi ne faros kion vi pensas, ĉar, kvankam vi opinias, ke mi reagis naive kaj ekstreme en defendo de mia honoro, mi ne pretendas imiti Lukrecian; laŭdire ŝi mortigis sin, kvankam ŝi kulpis je nenio, sen unue preni la vivon de la viro kaŭzinta ŝian misfortunon. Mi mortos, se mi devas morti, post ol mi kontentige min venĝos kontraŭ la persono, kies insolento metis min en tiel kompromitan kaj plorigan situacion, sen ia kulpo de mia flanko.

Necesis multe da petoj ĝis fine Leonela eliris voki Lotarion; kaj dum la ĉambristino forestis, Camila diris, kvazaŭ parolante al si mem:

—La ĉielo min helpu! Ĉu ne estus pli saĝe denove repuŝi Lotarion, kiel mi jam multfoje faris, anstataŭ doni al li okazon pensi, ke mi estas senpudora kaj perfida, eĉ se tion li pensus nur tempeton, ĝis mi pruvus al li, ke li sin trompas? Jes, pli saĝe estus repuŝi lin... sed ĉi-okaze mi ne povus venĝi min, kaj la honoro de mia edzo ricevus nenian kontentigon, se Lotario sin eltirus facile kaj senĝene el la situacio, kien liaj perversaj ideoj lin metis. La perfidulo pagu per sia vivo sian lascivan deziron; la mondo sciu (se iam diskoniĝos ĉi afero), ke Camila ne nur tenis sin fidela al sia edzo, sed eĉ venĝis lin kontraŭ ties insolenta ofendinto. Ĉu ne estus pli bone informi Anselmon pri ĉio ĉi? Cetere, mi jam aludis ĉi problemon en la letero, kiun mi sendis al li, kiam li troviĝis en la vilaĝo, kaj mi pensas, ke li ne revenis por ripari

la damaĝon, ĉar, pro liaj supermezure grandaj bono kaj fido, li nek povis, nek volis kredi, ke la koro de tiel sindona amiko kiel Lotario kapablus kovi ian perfidon kontraŭ lia honoro; post ol mi skribis la leteron, kaj dum multaj tagoj, ankaŭ mi ne imagis tiaĵon, kaj neniam ĝin imagus, se lia insolento ĉiufoje pli insista ne montrus per grandaj promesoj, senĉesaj larmoj kaj prezento de donacoj la naturon de lia intenco. Sed, kial mi tiel parolas nun? Ĉu sentima rezoluteco bezonas la instigon de vortoj? Certe ne. Aperu do, perfidulo! Kaj same vi, venĝo! La falsa amiko enpaŝu, venu, proksimiĝu kaj pereu! Poste, io ajn okazu! Pura mi venis en posedon de la viro, kiun la ĉielo donis al mi, kaj pura mi deiros de li, eĉ se mi banos min en mia ĉasta sango kaj en la sango perversa de la plej falsa amiko sur ĉi mondo.

Dum ŝi parolis, ŝi faris senordajn kaj nekoherajn paŝojn, ĉirkaŭirante en la ĉambro kun la ponardo nuda en la mano, kaj tiel strange gestadis, ke ŝi ŝajnis freneza kaj pli simila al despera bandito ol al virino delikata.

Anselmo, kaŝita per kelkaj tapiŝoj, ĉion rigardis kun miro. Ŝajnis al li, ke li vidis kaj aŭskultis sufiĉe por senvalidigi eĉ la plej gravan suspekton, kaj li timis la alvenon de Lotario, ĉar tio povus okazigi ian subitan misfortunon. Sed, kiam li pretis montri sin por brakumi kaj konsoli sian edzinon, li haltis, ĉar li vidis, ke Leonela revenas, kondukante Lotarion je la mano. Kaj, tuj kiam Camila lin vidis, ŝi faris per la ponardo longan linion sur la plankon antaŭ si kaj diris:

—Aŭskultu, Lotario, se vi kuraĝus trapaŝi ĉi linion, aŭ eĉ proksimiĝi al ĝi, en la sama momento mi puŝus al mi la ponardon en la koron. Ne respondu al tio eĉ per unu vorto, kaj aŭskultu min ankoraŭ: poste vi povos paroli laŭplaĉe. Mi volas unue, Lotario, ke vi diru, ĉu vi konas mian edzon, kaj kian opinion vi havas pri li; due, mi volas scii, ĉu vi konas

min. Respondu sen hezito aŭ embaraso, ĉar ne pri enigmoj mi demandas al vi.

Lotario ne estis tiel stulta por ne kompreni la intencon de Camila, de la momento kiam ŝi petis helpon, por ke Anselmo sin kaŝu; sekve li sin agordis tiel lerte kaj oportune al ŝia maĥinacio, ke la mensogado de la paro ŝajnis pli pura vero ol la vero mem. Do li jene respondis al ŝi:

—Mi ne kredis, bela Camila, ke vi vokus min demandi pri aferoj tiel senrilataj al la objekto de mia veno. Se vi intencas tiamaniere prokrasti la plenumon de viaj promesoj, vi devus diri tion al mi de pli longa distanco, ĉar ju pli oni proksimiĝas al sia sopiro, des pli torturas la deziro ĝin posedi. Sed, por ke vi ne diru, ke mi ignoras viajn demandojn mi respondas, ke mi konas vian edzon Anselmo, kaj li min, jam de niaj infanaj jaroj. Pri nia amikeco mi diros nenion; vi tre konas ĝin, kaj se mi ĉi-momente ĝin ofendas, pri tio kulpas la amo, potenca kaŭzo de eĉ pli kondamnindaj pekoj. Rilate al vi, ankaŭ vin mi konas kaj amas tiom, kiel via propra edzo, ĉar necesas ĉarmoj kiel la viaj, por ke mi ignoru la devon ŝuldatan al mia memestimo kaj la sanktan leĝon de la vera amikeco; sed ĉion mi rompis kaj profanis, pelate de ĉiopova tirano: de la amo.

—Se vi tion konfesas, ĝismorta malamiko de la vera amo — respondis Camila—, kial vi aŭdacas aperi antaŭ mi, t.e., antaŭ la spegulo kie rigardas sin la viro tiel senkaŭze kaj senkonsidere ofendata de vi? Sed, ve al mi! Mi komprenas nun, kial vi forgesis la devon ŝuldatan al via propra digno. Eble tial, ke mi faris ian frivoleon, kiun oni ne devus rigardi manko de pudoro, ĉar ne pro antaŭplanita intenco ĝi okazis; certe temis pri unu el la petolaĵoj, kiujn la virinoj ofte kaj senpense faras, kiam ili opinias, ke ne ekzistas motivo por troa rezerviĝemo. Se ne, diru, perfida: ĉu mi iam respondis al via flatado eĉ per unu vorto aŭ gesto, kiu povus vekti en vi eĉ

la plej etan esperon, ke vi atingus vian perversan deziron? Ĉu mi ne respondis per rigoraj kaj sekaj vortoj al viaj amaj esprimoj? Ĉu mi iam kredis aŭ akceptis viajn promesojn kaj donacojn? Sed, ĉar ŝajnas al mi, ke oni ne povas persisti tiel longe en la amindumado, se oni ĝin ne bazas sur la espero, mi volas atribui al mi la kulpon de via insolento; sendube, ia manko de singardo de mia flanko igis vin ĉirkaŭsieĝadi min, kaj tial, mi volas submeti min al la puno, kiun via kulpo meritas. Mi venigis vin ĉi tien, por ke vi vidu, ke se mi kruelas al mi mem, mi ne povas ne krueli ankaŭ al vi, kaj por ke vi estu atestanto de mia ofero al la insultata honoro de mia edzo. Vi ofendis lin plej intence, kaj ankaŭ mi lin ofendis, ĉar, pro mia manko de singardo, mi eble favoris kaj stimulis vian perversan deziron. Mi ripetas, ke plej ĉagrenas min la suspekto, ke vi kovis tiel sensencajn pensojn kaŭze de ia frivoleto mia, kaj mi fervore deziras tion puni al mi propramane, ĉar, se alia persono ekzekutus min, eble mia krimo fariĝus pli publika. Sed antaŭ ol morti, mi volas por plene kontentigi mian deziron de venĝo, preni kun mi la vivon de la homo puŝinta min al ĉi nigra situacio, kaj vidi, ke lin kondamnas al la puno meritita la rigora kaj senpartia tribunalo ĉiela.

Tion dirinte, Camila, kun nekredebla forto kaj rapido, sin ĵetis kontraŭ Lotario, kaj kun tiela decido kaj energio volis piki al li la bruston per la nuda ponardo, ke li ekdubis, ĉu ŝiaj provoj estas veraj aŭ falsaj, kaj fine li devis uzi sian tutan lerton kaj forton, por ke Camila ne lin vundu. Tiel majstre ŝi ludis sian strangan rolon de mistifiko kaj trompo, ke ŝi eĉ verŝis iom el sia propra sango por doni al la sceno ankoraŭ kroman koloron de verŝajno. Efektive, vidante, ke ŝi ne povas vundi Lotarion —aŭ ŝajnigante, ke ŝi ne povas—, Camila diris:

—La sorto ne volas, ke mi plene kontentigu mian justan deziron, sed mi havos forton sufiĉan por plenumi ĝin

almenaŭ parte.

Per abrupta ektiro ŝi liberigis la manon kun la ponardo retenitan de Lotario, enpuŝis al si la pinton en lokon ne danĝere vundeblan, inter la akselo kaj la liva ŝultro, kaj poste lasis sin fali, kvazaŭ en sveno. Ĉe tia sceno Leonela kaj Lotario rigidiĝis de konsterno kaj miro, kaj ne sciis kion pensi, vidante, ke Camila, makulita de sango, kuŝas sur la planko.

Terurita kaj senspira, Lotario tuj hastis eltiri el ŝi la ponardon, sed kiam li rimarkis, ke la vundo estas nur surfaca, li perdis la timon kaj denove miris je la ruzo, la aplombo kaj la talento de la bela Camila; sed, por ludi sian rolon, Lotario komencis longe kaj triste lamenti super la korpo de Camila, kvazaŭ ŝi estus senviva, kaj malbenis, ne nur sin, sed ankaŭ la viron kulpantan je tia misfortuno. Kaj pro tio, ke li sciis, ke lia amiko Anselmo lin aŭskultas, li esprimis sian desperon per tiaj vortoj, ke iu ajn sentus al li pli da kompatato ol al Camila, eĉ se vere ŝi estus morta. Leonela prenis ŝin en siajn brakojn, metis ŝin sur la liton kaj suplikis Lotarion iri serĉi iun, kiu kuracus sekrete la sinjorinon. Ŝi poste petis lin konsili ŝin kion ili devus diri al Anselmo pri la vundo de Camila, se okaze li revenus antaŭ ol ŝi resaniĝus.

Lotario respondis, ke ili diru ion ajn, ĉar li troviĝas tro konsternita por doni utilan konsilon; li nur petis ŝin provi ĉesigi la hemoragion de Camila, kaj aldonis, ke li ekzilos sin for de la vido de la homoj. Kun grandaj montroj de doloro kaj emocio li eliris el la domo, kaj kiam li vidis sin sola kaj neobservata, li ne povis ne fari al si multfoje la signon de la kruco, ĉar li miris ankoraŭ je la talento de Camila kaj je la aktorina lerto de Leonela. Li pensis, ke Anselmo plene kaj sendube konvinkiĝis, ke ŝia edzino egalas al Porcia,^[148] kaj li deziris denove vidi lin por kune celebri la plej subtilan trompon kaj la plej versimilan mensogon imageblajn.

Kiel dirite, Leonela viŝis de sia sinjorino la sangon — kvankam ĝi fluis nur en la kvanto sufiĉa por kreditigi la scenon—, poste lavis per iom da vino la vundon, kaj vindis ĝin, kiom ŝi povis. Dume, ŝi esprimis sin per tiaj vortoj, ke eĉ se nenion oni estus antaŭe dirinta, ili solaj sufiĉus por konvinki Anselmon, ke li posedas en la persono de Camila la ĉaston mem. Al la vortoj de Leonela, Camila aldonis la siajn. Ŝi nomis sin poltrona kaj lepor-anima, ĉar en la momento, kiam kuraĝo estis al ŝi plej necesa, ŝi ne havis ĝin por preni de si sian abomenindan vivon. Ŝi demandis al sia ĉambristino, ĉu konvenus, aŭ ne, informi al ŝia kara edzo pri la okazaĵo, kaj Leonela konsilis diri al li nenion, por ne meti lin en la devon venĝi sin kontraŭ Lotario, kio implikis ankaŭ Anselmon en gravan riskon; ŝi aldonis, ke honesta virino devas, ne doni, sed eviti al sia edzo ĉian motivon de kvereloj. Camila respondis, ke ŝi trovas tre bona ŝian konsilon, kaj ke ŝi observos ĝin, sed ke, ĉiuokaze ili bezonas doni ian klarigon pri ŝia vundo, ĉar Anselmo certe ĝin rimarkos. Al tio Leonela respondis nur, ke ŝi ne mensogus eĉ en ŝerco.

—Kaj mi, kara? —diris Camila—. Mi kuraĝus nek forĝi nek subteni mensogon, eĉ se mia vivo dependus de tio. Kaj se ni ne scios eltiri nin el ĉi situacio, estos pli bone konfesi al li la tutan veron, antaŭ ol li vidus, ke ni nin implikas en mensogon.

—Ne zorgu, sinjorino —respondis Leonela—. De nun ĝis morgaŭ mi elpensos ion por diri al li. Eble vi povos kaŝi de li la vundon, se konsideri, kie ĝi troviĝas, kaj la ĉielo montros sin favora al niaj justaj kaj virtaj intencoj. Sereniĝu, sinjorino, klopodu kvietigi vian emocion, por ke sinjoro Anselmo ne trovu vin en tiel granda ekscito. Ĉion alian lasu al mi, kaj al Dio, kies helpo neniam mankas al la bonaj deziroj.

Anselmo atentege aŭskultis kaj observis ĉi tragedion, kie oni prezentis la morton de lia honoro tiel arte kaj patose, ke la aktorinoj ŝajnis transformi la fikcion en la puran veron. Li senpacience atendis la venon de la nokto por havi la ŝancon eliri el la domo, viziti sian amikon Lotario kaj sin gratuli kun li pro la posedo de tiel valora perlo, kia pruviĝis Camila en la defendo de sia virto. La du virinoj zorgis pri tio, doni al li la okazon facile elŝteliĝi, kaj Anselmo, ĝin kaptinte, eliris kaj sin direktis al la hejmo de Lotario. Neeblas kalkuli kiom da fojoj li brakumis lin, kiom da aferoj li diris en sia kontento, kiom da laŭdoj li dediĉis al Camila. Lotario aŭskultis lin sen montri eĉ la plej etan ĝojon, ĉar li ne povis forgesi, kiel senkonsidere oni trompis lian amikon, kaj kiel kruele li mem ofendis lin. Kvankam Anselmo rimarkis la apation de Lotario, li atribuis ĝin al tio, ke li sentis sin kulpa pri la vundo de Camila. Tiel do, li diris al li, interalie, ke li ne devas zorgi pri la akcidento de Camila, ĉar sendube la vundo estas supraĵa, tial, ke la du virinoj interkonsentis ne riveli al li la aferon; ke li devus timi do nenion kaj anstataŭe ĝoji kaj sin gratuli kun li, ĉar, dank' al lia interveno kaj sindediĉo, li, Anselmo, atingis la plej altan pinton de la feliĉo. Tial li deziris, ke Lotario sin distru nur verkante poemojn je laŭdo de Camila por eternigi ŝin en la memoro de la futuraj epokoj. Lotario gratulis lin pro lia ideo kaj aldonis, ke li, de sia flanko, helpus lin konstrui tiel noblan monumenton.

Anselmo transformiĝis tiel en la plej feliĉan trompaton sur la mondo; li mem kondukis je la mano la pereon al sia domo, kredante konduki la instrumenton de sia gloro. Camila ricevis Lotarion kun ŝajne serioza mieno, sed kun ridetanta koro. Ĉi trompado daŭris kelke da tempo, ĝis post pluraj monatoj Fortuno turnis sian radon, la perverso tiel ruze kaŝita iĝis publika, kaj la stulta scivolo de Anselmo kostis al li la vivon.

[146] La kvar S respondas al la komencaj literoj de la kvar jenaj vortoj: saĝa, sola, servema kaj sekreta.

[147] En ĉi alfabet-orda listo mankas kelkaj literoj de la Esperanta aboco, sed ankaŭ en la originalo mankas aliaj de la hispana alfabeto.

[148] Porcia, edzino de Marko Bruto. Kiam ŝi sciis pri la morto de sia edzo en Filipos, ŝi prenis de si la vivon, glutante kelke da ardaĵ braĝoj.

Ĉapitro 35

Kun la feroca kaj monstra batalo de don Quijote kontraŭ felsakoj de ruĝa vino, kaj kun la fino de la novelo pri la stulta scivolo

Apenaŭ restis por lego ĝis la fino de la novelo, kiam el la mansardo, kie don Quijote ripozis, eliris Sancho Panza tute alarmite kaj kriante:

—Rapidu, sinjoroj, tuj venu helpi mian sinjoron! Li troviĝas meze de la plej feroca kaj sanga batalo, kian mi ĝis nun ne vidis. Je Dio! Li donis tiel fortan hakon al la giganto malamiko de sinjorino princino Micomicona, ke li detranĉis al li la kapon tiel facile kiel napon.

—Kion vi diras, frato? —demandis la licenciulo, interrompinte la legon de la novelo—. Ĉu vi havas viajn sensojn en sana stato? Kiel, je la diablo, povus tio okazi, se konsideri, ke la giganto troviĝas ses mil mejlojn de ĉi tie?

Tiam aŭdiĝis terura bruo en la ĉambro de don Quijote, dum li kriis:

—Haltu, latrono fanfarona, kanajlo! Jen mi! Nun via cimitaro^[149] ne tre taŭgos al vi!

Kaj ŝajnis, kvazaŭ li donus fortajn hakojn sur la murojn.

—Ne aŭskultu tie senmove —diris Sancho —Prefere interrompu la batalon, aŭ helpu mian mastron; kvankam helpon li ne bezonas, ĉar, certe, la giganto jam mortis, kaj donas nun al Dio konton de sia perversa vivo tera. Mi vidis

flui sangon sur la planko kaj kuŝi ĉe la flanko de la giganto ties detranĉitan kapon, grandan kiel felsako de vino.

—Oni prenu de mi la vivon —diris la gastejestro— se don Quijote, aŭ don diablo, ne hakis unu aŭ alian el la felsakoj da ruĝa vino kuŝantaj ĉe la kapo de lia lito! La sakoj plenis, kaj kion ĉi ulo prenas por sango, tio devas esti la vino disverŝita!

Kure li iris al la mansardo kaj, post li, la tuta grupo. Ili trovis don Quijote en la plej stranga vesto de la mondo: li surportis nur la ĉemizon, kies fronto ne estis sufiĉe longa por bone kovri al li la femurojn, kaj kies postoj estis ses fingrojn kurta; liaj gamboj, longaj kaj magraj, plenaj de vilo, vidiĝis ne tre puraj; sur lia kapo sidis ĉapeto ruĝa kaj grasa, apartenanta al la gastejestro. De lia liva brako pendis, ĉirkaŭvolvite, la lita plejdo, kiun Sancho abomenis pro kialo tre konata de li; [150] kaj per la dekstra li svingis la glavon, donante hakojn ĉien, kaj parolante, kvazaŭ li vere batalus kontraŭ giganto. La kurioza aspekto de la afero kuŝis en tio, ke li havis la okulojn fermitaj, ĉar li dormis, sonĝante, ke li duelas kontraŭ la giganto: tiel forte kaj ripete li hakis la sakojn, kredante haki la giganton, ke la tuta ĉambro plenis de vino, kaj la gastejestro, vidante la spektaklon, tiel koleriĝis, ke li furioze atakis la hidalgon per la pugnoj; kaj se Cardenio kaj la pastro ne estus lin retenintaj, li baldaŭ metus finon al la milito kontraŭ la giganto. Tamen la kompatinda kavaliro ne vekiĝis, ĝis la barbiro alportis grandan kuvon plenan de frida akvo el la puto kaj, per subita eksvingo, ĵetis la likvon plene sur la korpon de don Quijote, kaj vekis lin, kvankam ne tiom, ke li konscius sian duonnudan staton. Dorotea, vidante lin en tiel leĝera negliĝo, ne volis eniri por spekti la batalon inter sia ĉampiono kaj sia malamiko.

De sia flanko, Sancho komencis serĉi tra la tuta planko la kapon de la giganto kaj, ĉar li ĝin ne trovis, li diris:

—Jes, mi bone vidas, ke ĉio en ĉi domo estas ensorcĉita; la alian fojon, en ĉi sama loko kie mi staras nun, mi ricevis multe da frapoj kaj kalcitroj, sed tute ne sciis kio min batis, ĉar ĉiam ĝi estis nevidebla; kaj nun la kapo de la giganto ne aperas, kvankam mi vidis propraokule, kiel oni ĝin detranĉis, kaj kiel la sango ŝprucis de la korpo, kvazaŭ de fonto.

—Pri kia sango kaj pri kia fonto vi parolas, malamiko de Dio, kaj de la sanktuloj? —demandis la gastejestro—. Ĉu vi ne vidas, fripono, ke la sango kaj la fonto estas nenio alia ol ĉi felsakoj trapikitaj, kaj ĉi ruĝa vino, en kiu la ĉambro naĝas? Mi vidu la animon de la trapikinto naĝi en la infero!

—Mi scias nenion —diris Sancho—, nur, ke oni devas min kompati, ĉar, se mi ne trovos la kapon de la giganto, mia grafolando solviĝos kiel salo en akvo.

Kaj tiamaniere Sancho, nedorma, pli absurdas ol don Quijote endorma: ĝis tia ekstremo lin obsedis la promesoj de lia mastro. La gastejestro desperis ĉe la stulto de la ŝildisto kaj la misagoj de la mastro, kaj ĵuris, ke nun ne okazos kiel la pasintan fojon, kiam ili foriris sen pagi; nun la privilegioj de la kavalirismo ne evitos al ili pagi la oldan konton kun la nova, inkluzive de la flikoj surkudrotaj al la ŝiritaj felsakoj.

La pastro retenis je la mano la kavaliron, kiu, kredante, ke li finis la aventuron kaj troviĝas antaŭ la princino Micomicona, genuiĝis antaŭ la licenciulo kaj diris:

—Via Grandeco, alta kaj bela sinjorino, estu certa, ke de nun ĉi bastardo ne plu ĝenos vin; kaj same de nun, mi konsideras min libera de la promeso, kiun mi faris al vi, ĉar, kun la helpo de la ĉiopova Dio, kaj kun la fervoro de la sinjorino, por kies amo mi vivas kaj spiras, mi perfekte plenumis mian vorton.

—Ĉu mi ne pravis? —ekkriis Sancho—. Mi ne vidis viziojn, mi ne estis ebria. Morta, kaj eĉ peklita, estas la giganto! La

okazaĵo okazis, kaj la grafolando falos al mi en la manojn kiel matura frukto!

Ĉu oni povus reteni la ridon ĉe la absurdoj de la servisto kaj de ties mastro? Ĉiuj ridis, krom la gastejestro, kiu rekomendadis sin al la diablo. Fine Cardenio, la barbiro kaj la pastro sukcesis, ne sen granda peno, meti la kavaliron en la liton, kie li tuj dormiĝis en stato de ekstrema laco. Ili lasis lin dormi kaj iris al la vestiblo de la gastejo por konsoli la ŝildiston Sancho pro tio, ke li ne trovis la kapon de la giganto; sed fine ili devis pli penadi ankoraŭ por kvietigi la desperon de la gastejestro, furiozanta pro la subita pereco de la felsakoj. Kaj lia edzino diris laŭte kaj krie:

—Malbena trafu la tagon kaj la horon de la alveno de ĉi vaganta kavaliro al mia domo! Mi volus vidi lin neniam, tiel kare li kostas al mi! La lastan fojon, li foriris sen pagi la vespermanĝon, nek la liton, nek la pajlon, nek la hordeon por li, por lia ŝildisto kaj por unu ĉevalo kaj unu azeno, dirante, ke li estas kavaliro aventuristo (mizerajn aventurojn Dio donu al li kaj al la ceteraj aventuristoj de ĉi mondo) kaj ke li devas pagi neniom, ĉar tion postulas la reguloj de la vaganta kavalirismo; poste, por aferoj koneksaj kun li, venis ĉi alia sinjoro, prenis kun si mian voston kaj ĝin redonis kun damaĝoj, kostantaj pli ol kvarono de realo, kaj tiel senhara, ke ĝi ne plu taŭgos al mia edzo. Kaj nun, kiel kulmino, la rompo de miaj sakoj kaj la verŝo de mia vino! Lian sangon mi vidu verŝita! Sed ili ne pensu, ke ili facili elturniĝos! Je la ostoj de mia patro kaj je la vivo de mia patrino mi ĵuras, ke se ili ne pagos ĉion, ĝis la lasta maravedo, mi ne meritos porti mian nomon, nek esti filino de mia patro!

Ĉi vortojn, kaj aliajn similajn, sputis furioze la gastejestrino; ŝia bona servistino Maritornes kunkriis kun ŝi la samajn argumentojn, sed la filino silentis kaj nur ridetis de tempo al tempo. La pastro ĉion kvietigis, promesante laŭeble

kompensi al ŝi la perdojn por la felsakoj kaj la vino kaj speciale por la damaĝoj al la vosto, tiel kara al ŝi. Dorotea konsolis la ŝildiston Sancho Panza, promesante al li, ke, kiam evidentiĝos, ke lia mastro senkapigis la giganton, kaj kiam ŝi denove pace sidos en la trono de sia regno, ŝi donos al li la plej bonan grafolandon tiean. Sancho kontentiĝis per tio, kaj insistis al la princino, ke ŝi estu certa, ke li vidis la kapon de la giganto, kaj ke, jen konfirmo de lia aserto, ĝi havis barbon longan ĝis la talio. Tamen, se la kapo ne aperis, tio okazis, ĉar la domo estis ensorĉita, kiel li mem spertis, kiam li gastis tie la lastan fojon. Dorotea respondis, ke ŝi opinias same kiel li, kaj, ke li ne devus zorgi, ĉar la aferoj iros glate kaj laŭdezire.

Kiam ĉiuj fine trankviliĝis, la pastro esprimis sian deziron legi la novelon ĝis la fino, vidante, ke nur kelkaj paĝoj restas. Dorotea, Cardenio kaj la aliaj petis lin plu legi, kaj, ĉar li deziris ilin kontentigi kaj samtempe plezurigi sin, li daŭrigis la rakonton, dirante:

—Okazis do, ke, certa pri la virto de Camila, Anselmo vivis feliĉa kaj libera de zorgoj. Camila, intence tenis sin serioze kaj disdegne antaŭ Lotario, por ke ŝia edzo pensu, ke ŝi havas al Lotario inklinon malan al la vera. Por plifortigi ĉi opinion en sia amiko, Lotario petis de li permeson por ĉesi iri al li, ĉar videble lia ĉeesto tre ĉagrenis Camilan. Sed la trompata Anselmo energie respondis, ke li ne konsentos tion; kaj tiel, en mil manieroj, Anselmo estis la arkitekto de sia propra infamio, dum li sin kredis konstruanto de sia feliĉo.

»En ĉi cirkonstancoj Leonela, vidante sin libera por la kontentigo de siaj plezuroj, tiel senbride sin donis al ili, ke ŝi ignoris ĉion ceteran, ĉar ŝi fidis sian sinjorinon, kies kompliceco iris ĝis la ekstremo rekomendi al Leonela pli konvenajn aranĝojn de ŝiaj rendezuoj. Nu, iun nokton

Anselmo aŭdis paŝojn en la ĉambro de Leonela, kaj, kiam li provis eniri por vidi kiu estas tie, li sentis, ke de la alia flanko oni retenas la pordon fermita, kio vekis en li eĉ pli grandan deziron ĝin aperti; kaj tiom da forto li aplikis, ke la pordo cedis, kaj, enirante, li ĝustatempe vidis unu viron eksalti tra la fenestro al la strato; kvankam li impetis antaŭen por kapti lin, aŭ por vidi almenaŭ kiu li estas, li sukcesis nek ĉe unu, nek ĉe la alia afero, ĉar Leonela sin kroĉis al li, dirante:

»—Trankviliĝu, sinjoro, ne ekscitiĝu. Ne sekvu la viron saltintan de ĉi tie. Nur min tuŝas la afero. Efektive, li estas mia edzo.

»Anselmo ne kredis ŝin; kontraŭe, blinda de kolero, li eltiris la pordon kaj minacis, ke li mortigos ŝin, se ŝi ne diros la veron. Leonela, plena de teruro, sen scii kion ŝi diras, respondis:

»—Ne mortigu min, sinjoro, mi rakontos al vi ion tiel gravan, ke vi ne povus ĝin imagi.

»—Nu, tuj, rakontu —diris Anselmo—. Se ne, vi pereos.

»—Neeble ĉi-momente —respondis Leonela—. Mi estas tro ekscitita. Lasu min ĝis morgaŭ, kaj tiam mi rivelos al vi unu aferon, kiu konsternos vin. Sed kedu, la saltinto tra la fenestro estas junulo de ĉi urbo: li promesis edziĝi al mi.

»Per tio Anselmo trankviliĝis kaj decidis atendi la tempon difinitan de Leonela, ĉar li tute ne pensis, ke li povus aŭskulti ion kontraŭ Camila: tiel certa kaj kontenta li estis pri ŝia virto. Li eliris do el la ĉambro kaj enŝlosis en ĝi la servistinon, avertinte ŝin, ke ŝi restos tie, ĝis ŝi rivelos al li sian sekreton.

»Anselmo iris tuj al Camila kaj rakontis al ŝi la incidenton kaj la promeson de Leonela riveli al li aferon grandan kaj

gravan. Superfluas diri, ke Camila konsterniĝis. Ĉar ŝi suspektis, ne senmotive, ke Leonela rivelos al Anselmo ŝian perfidon, Camila sentis tian teruron, ke, sen kuraĝi atendi, ĉu ŝia suspekto pruviĝos vera aŭ ne, tiun saman nokton, kiam ŝajnis al ŝi, ke Anselmo dormas, ŝi prenis siajn plej bonajn juvelojn kaj iom da mono kaj, neobservate, elŝteliĝis el la domo kaj iris rekte al Lotario. Tie ŝi rakontis al li la okazaĵon kaj petis lin konduki ŝin al sekura kaŝejo, aŭ fuĝi kun ŝi al loko, kie Anselmo ne povus trovi ilin. Tiel grandan konfuzon metis Camila en la koron de Lotario, ke li ne nur ne sciis kion fari, sed eĉ ne kapablis respondi unu solan vorton. Fine li decidis konduki ŝin al klostro, kies priorino estis fratino lia. Camila konsentis iri tien, kaj kun la urĝo, kiun la situacio postulis, Lotario tion faris, lasis ŝin en la klostro kaj tuj poste foriris de la urbo, dirinte adiaŭ al neniuj.

»Ĉe la tagiĝo, Anselmo tiel deziregis scii kion Leonela promesis diri, ke, sen rimarki, ke Camila forestas de lia flanko, li ellitiĝis kaj iris al la ĉambro, kie li antaŭe enfermis la servistinon. Li apertis la pordon, paŝis en la internon kaj trovis ĝin dezerta; sed li rimarkis kelke da litotukoj noditaj al la fenestro kaj komprenis, ke Leonela descendis per ili kaj eskapis. Konfuzita, li tuj revenis por rakonti la aferon al Camila, sed konsterniĝis, kiam li ne trovis ŝin en la lito, nek ie en la domo. Li demandis pri ŝi al la geservistoj, sed neniuj povis doni kontentigan respondon. Fine, serĉante ankoraŭ Camilan, li hazarde rimarkis, ke ŝiaj kofretoj havas la kovrilon levita, kaj ke la pliparto de ŝiaj juveloj mankas. Tiam li komprenis, ke katastrofo falis sur lin, kaj ke ne de Leonela venas lia misfortuno. Tiel do, ĝuste kiel li estis, sen fini sian tualeton, trista kaj enpena, li iris al Lotario por informi lin pri sia malfeliĉo. Sed, kiam li ne trovis lin kaj la servistoj diris, ke ilia sinjoro foriris en la nokto kun sia tuta mono, Anselmo timis perdi la saĝon. Kaj, kiel kulmino de la tuta afero, kiam Anselmo revenis al si, li trovis la domon sola kaj dezerta, sen servistoj kaj ĉambristinoj.

»Li ne sciis kion pensi, diri aŭ fari, kaj iom post iom lia saĝo pli kaj pli ŝanceliĝis. Li vidis sin subite sen edzino, sen amiko, sen servistoj, forlasita de la ĉielo kaj, precipe, sen honoro, ĉar en la fuĝo de Camila li vidis sian propran pereon. Fine, post longa tempo li decidis iri al sia kampara amiko, en kies domo li antaŭe gastis por doni la la paro la ŝancon aranĝi tiel teruran misfortunon. Li ŝlosis la pordojn de sia domo, ekrajdis la ĉevalon kaj kun deprimita animo komencis la vojaĝon. Apenaŭ li iris la duonon de la vojo, li deseliĝis, alligis la ĉevalon al trunko de arbo, lasis sin fali apud ĝi, kaj tie, torturata de siaj pensoj, ploris kaj ĝemis ĝis la krepuskiĝo. Tiam li vidis veni el la direkto de la urbo viron sur ĉevalo. Anselmo lin salutis kaj demandis kiaj novaĵoj cirkulas en Florenco.

»—La plej strangaj, kiajn de multaj tagoj oni ne aŭdas en la urbo —respondis la rajdanto—. Oni publike diras, ke Lotario, la granda amiko de tiu riĉa Anselmo loĝanta en la kvartalo San Juan, ĉi-nokte fuĝis kun ties edzino Camila, kaj ankaŭ, ke Anselmo mem malaperis. Ĉion ĉi rakontis la ĉambristino de Camila, post ol la gubernatoro surprizis ŝin, kiam ŝi descendis per litotuko el fenestro de la domo de Anselmo. Nu, mi ne scias detale kio okazis, sed en la tuta urbo oni miras pri la afero, ĉar oni ne povis imagi ion tian, se konsideri, ke, tiel granda kaj intima amikeco ekzistis inter la du viroj, ke oni nomis ilin «la du amikoj».

»—Ĉu oni scias kiun vojon prenis Lotario kaj Camila?

»—Tute ne —respondis la rajdanto—, kvankam la gubernatoro tre aktivis, serĉante ilin.

»—Dio vin gardu, sinjoro —diris Anselmo.

»—Ankaŭ vin —respondis la alia, forirante.

»Ĉe tiel teruraj novaĵoj, Anselmo preskaŭ perdis, ne nur la saĝon, sed eĉ la vivon. Li stariĝis, kiel li povis, kaj alvenis al sia amiko, kiu ankoraŭ sciis nenion por lia misfortuno. Sed, kiam li vidis lin enpaŝi pala kaj konsumita, li komprenis, ke li suferas gravegan afekcion. Anselmo tuj petis, ke oni helpu lin iri en la liton, kaj ke oni donu al li plumon kaj paperon. Oni tion faris kaj, ĝuste kiel li volis, oni lasis lin sola en la lito kaj kun la pordo fermita. En tia situacio, tiel ŝarĝiĝis lia menso pro la pezo de lia misfortuno, ke li klare sentis en si la simptomojn, ke lia vivo proksimiĝas al al fino. Sekve li decidis postlasi klarigon pri la kaŭzo de sia stranga morto kaj komencis skribi; sed, antaŭ ol li finus la noton, li ĉesis spiri, kaj lian vivon estingis la doloro kaŭzata de lia stulta scivolo. La mastro de la domo, surprizita pro la longa silento de Anselmo, decidis eniri en lian ĉambron por vidi, ĉu lia afekcio intensiĝis, kaj trovis lin kuŝanta sur la ventro, kun la duono de la korpo en la lito, kun la alia duono sur la skribotablo, kie vidiĝis la papero de li skribita, kaj kun la plumo ankoraŭ en la mano. Li vokis la kuŝanton, ne ricevis respondon, proksimiĝis al li, prenis ties manon, trovis ĝin frida kaj rimarkis, ke li jam mortis. Plena de konsterno kaj profunde afliktita, li vokis la domanojn, ke ili atestu la bedaŭrindan finon de la vivo de Anselmo, kaj poste li legis la paperon skribitan de lia mano. Ĝi tekstis jene:

Stulta kaj danĝera scivolo prenis de mi la vivon. Se Camila aŭdos la novaĵon pri mia morto, ŝi sciu ankaŭ, ke mi pardonas ŝin, ĉar ŝi havis nenian devon fari miraklojn, kaj mi ne bezonis peti ilin de ŝi. Tial, ke mi estis la arkitekto de mia infamio, ne ekzistas motivo por...

»Anselmo skribis nur ĝis tie, kaj certe li mortis, antaŭ ol li povus fini la frazon. La sekvantan tagon, la amiko de Anselmo sendis mesaĝon al liaj parencoj pri lia morto. Ili jam sciis pri lia misfortuno kaj pri la klostro, kie Camila, pli afliktita pro la foresto de sia amanto ol pro la morto de

Anselmo, troviĝis preskaŭ en la stato sekvi sian edzon en ties definitiva vojaĝo. Oni diris, ke kvankam ŝi estis vidvino, ŝi ne volis forlasi la klostron kaj ankaŭ ne fariĝi monaĥino. Sed kelke da tagoj poste, ricevinte la novaĵon, ke Lotario mortis en batalo okazinta inter la trupoj de Monsieur de Lautrec kaj la soldatoj de la Granda Kapitano Gonzalo Fernández de Córdoba en la regno de Napolo, kie lastatempe troviĝis la tarde pentanta amiko, Camila faris la votojn, sed iom poste la rigoraj manoj de la aflikto kaj de la melankolio estingis ŝian vivon. Tiel finiĝis la ekzisto de tri personoj, ĉar ili komencis tiel sensencan aferon.

-Nu, ĉi rakonto ŝajnas al mi bona —diris la pastro—, sed mi ne povas kredi ĝin vera. Se temas pri fikcio, la aŭtoro erare fabelis, ĉar oni ne povas imagi, ke ekzistas viro sufiĉe stulta por fari tiel danĝeran provon. La intrigo estus akceptebla, se ĝi okazus inter amanto kaj amatino; sed inter edzo kaj edzino, ĝi ne havas logikon. Tamen la rakontarto de la aŭtoro plaĉas al mi.

[149] Neologismo. Hispane «cimitarra»; france «cimeterre»; angle «scimitar». Araba glavo kun klingo larĝa kaj kurba.

[150] Ĉar per tiu, aŭ per alia simila plejdo, oni bernis lin.

Ĉapitro 36

Pri aliaj strangaj eventoj okazintaj en la gastejo

Ĝuste tiam la gastejestro, kiu staris ĉe la pordo de la domo, diris:

—Jen, proksimiĝas bela trupo da irantoj; se ili haltos ĉi tie, ni havos *gaudeamus*.^[151]

—Kiaj homoj? —demandis Cardenio.

—Kvar viroj iras surĉevale —respondis la gastejestro—, rajdas laŭ la hispana stilo,^[152] portas lancojn kaj ŝildojn kaj havas la vizaĝon kovrita per nigraj maskoj. Kun ili rajdas sur flankselo^[153] virino en blanka robo, kun la vizaĝo same maskita kaj ilin akompanas du servistoj piede.

—Ĉu ili tre proksimas? —demandis la pastro.

—Tiom, ke ili jam alvenas —respondis la gastejestro.

Ĉe tiuj vortoj, Dorotea vualis al si la vizaĝon kaj Cardenio eniris en la ĉambron de don Quijote; tujtuje envenis la tuta grupo, kiun la gastejestro ĵus priskribis: la kvar rajdantoj, de gracia, distingita teniĝo, deĉevaliĝis kaj iris helpi la damon descendi de la flankselo; unu el ili levis ŝin per siaj brakoj kaj ŝin sidigis sur seĝo staranta ĉe la pordo de la ĉambro, kien Cardenio sin antaŭe kaŝis. Dume, nek ŝi, nek ili demetis la maskojn,^[154] nek diris unu solan vorton; nur la damo, sidiĝante, profunde suspiris kaj lasis fali la brakojn, kvazaŭ ŝi troviĝus konsumita kaj misfarta. La surpiedaj servistoj gvidis la ĉevalojn al la stalo.

Ĉe tio, la pastro, dezirante koni la identecon de tiaj homoj tiel strange vestitaj kaj tiel silentaj, proksimiĝis al la servistoj kaj demandis al unu.

—Nu, sinjoro —li respondis—, mi ne povus diri, kiuj ili estas; mi scias nur, ke ŝajne temas pri gravaj moŝtuloj, precipe la viro ĵus preninta inter siaj brakoj la damon, kiel vi vidis. Kaj mi imagas lin tia, ĉar la aliaj montras al li grandan respekton kaj faras nur kion li ordonas.

—Kaj la damo, kiu ŝi estas? —demandis la pastro.

—Mi same ne scias —respondis la servisto—, ĉar dum la tuta vojo mi ne sukcesis vidi al ŝi la vizaĝon. Mi nur aŭdis ŝin ofte suspiri kaj tiel forte ĝemi, ke ŝajnis, ke kun ĉiu ĝemo ŝiriĝis el ŝi la vivo. Ne strange, ke ni apenaŭ scias, ĉar mi kaj mia kompano iras kun ili de antaŭ nur du tagoj. Ili renkontis nin sur la vojo, promesante al ni tre altan pagon, persvadis nin iri kun ili ĝis Andaluzio.

—Ĉu vi aŭdis la nomon de iu el ili? —demandis la pastro.

—Tute ne —respondis la servisto—, ĉar ili vojaĝas en strange absoluta silento; ĉe ili aŭdiĝas nur la suspiroj kaj ĝemoj de la kompatinda sinjorino, kio tuŝas al ni en la koron; ni preskaŭ certas, ke la viroj devigas ŝin iri, kien ajn ili sin direktas; kaj, kiom oni povas juĝi laŭ ŝia robo, ŝi estas monaĥino, aŭ, kio ŝajnas pli certa, ŝi iras monaĥiniĝi; kaj ŝi aspektas tiel triste, ĉar eble ŝi ne elektus propravole la monaĥinan staton.

—Tre eble —respondis la pastro, kaj, ilin forlasinte, sin turnis al Dorotea, kies natura kompatemo tiel vekiĝis ĉe la suspiroj de la maskita virino, ke ŝi proksimiĝis al ŝi kaj diris:

—Kio vin afliktas, sinjorino? Se temas pri io, kion ni virinoj konas proprasperte kaj kapablas kuraci, mi tre volonte proponas al vi mian servon.

La afliktita damo nenion respondis, kaj kvankam Dorotea proponis denove sian helpon, la alia plu silentis, ĝis la maskita kavaliro —la obeato de la ceteraj, laŭ la diro de la servisto— proksimiĝis kaj diris al Dorotea:

—Sinjorino, ne insistu montri vian bonvolon al ĉi damo, ĉar ŝi kutimas ne danki kion oni faras por ŝi; kaj ne klopodu, ke ŝi respondu vin, se vi ne deziras aŭdi ŝin mensogi.

—Neniam mi mensogis —respondis la damo, ĝis tiam silenta —. Kontraŭe: mi nun vidas min en tiom da misfortunoj, ĉar mi ĉiam kondukis sincere kaj verdire; kaj mi volas ke vi mem konfirmu kion mi diras kvankam la pura ver-amo kiu sidas en mi, deklaras vin falsa kaj mensoga.

Cardenio klare aŭskultis ĉi vortoj, ĉar nur la pordo de la ĉambro de don Quijote staris inter li kaj la parolanto: kaj aŭdinte ŝin paroli, Cardenio tuj ekkriis:

—Granda Dio! Kion mi aŭdas? Kies voĉo trafis al mi en la orelon?

Ĉe tiaj krioj, la damo, konsternita, turnis la kapon kaj, ne vidante la alparolinton, stariĝis kaj ekiris en la direkto al la ĉambro. Sed la kavaliro tuj detenis ŝin kaj ne lasis ŝin fari eĉ unu solan paŝon. Pro ŝia agitiĝo kaj alarmo, la masko falis de sur ŝi, rivelante mirinde kaj senkompare belan vizaĝon, sed palan kaj miroplenan; ŝiaj okuloj sin turnis ĉien, kien la rigardo povus atingi, kun tiel angora insisto, ke ŝi ŝajnis kaptita de frenezo. Dorotea kaj la aliaj sentis al ŝi profundan kompaton, kvankam ili ne komprenis la kaŭzon de ŝia konduto.

La kavaliro forte ŝin tenis je la ŝultroj, sed li devis tiel streĉe okupiĝi per tio, ke li ne povis eviti la deŝovon kaj fine la forfalon de sia propra masko. Kaj kiam Dorotea, kiu same ĉirkaŭbrakadis la nekonatinon, levis la rigardon, ŝi vidis ke la

kavaliro retenanta la damon, estas ŝia edzo don Fernando; kaj apenaŭ ŝi lin rekonis, ŝi ŝanceliĝis dorsen senkonscia, elspirante unu longan kaj tristegan ĝemon el la profundo de sia animo; kaj tial, ke la barbiro staris proksima kaj prenis ŝin inter siaj brakoj, Dorotea ne falis sur la plankon. La pastro rapidis tiri de ŝi la vualon por ĵeti akvon sur ŝian vizaĝon kaj tiam don Fernando, kiu retenis ankoraŭ la alian damon, rekonis Dorotean kaj pro la surprizego rigidiĝis kvazaŭ morta. Tamen li ne delasis Luscindan (ŝi estis ja Luscinda), kiu baraktis por liberigi sin el liaj brakoj, kaj kiu renkontis la voĉon de Cardenio, same kiel li rekonis la ŝian. Cardenio aŭdis ankaŭ la ĝemon de Dorotea, kiam ŝi ekfalas senkonscia, kaj kredante, ke tia veo venis de lia kara Luscinda, impetis plena de teruro el la ĉambro kaj vidis unue, ke don Fernando retenas Luscindan en siaj brakoj. De sia flanko don Fernando same tuj rekonis Cardenion, kaj ili tri: Luscinda, Cardenio kaj Dorotea rigidiĝis kaj mutiĝis de miro, sen apenaŭ scii kio okazis al ili. Ĉiuj silentis kaj sin rigardis reciproke: Dorotea al don Fernando, don Fernando al Cardenio, Cardenio al Luscinda, kaj Luscinda al Cardenio. Luscinda rompis la unua la silenton, jene parolante al don Fernando:

—Lasu min, don Fernando, almenaŭ pro konsidero al via memrespekto, se ne pro aliaj motivoj. Lasu min kroĉiĝi al la muro, kies hedero nedisigebla mi estas malgraŭ via sintrudo, viaj minacoj, viaj promesoj kaj viaj donacoj; rigardu, kiel la ĉielo, laŭ maniero stranga kaj mistera al ni, kondukis min antaŭ mia vera edzo; vi tre bone lernis per mil multekostaj lecionoj, ke nur la morto povus forviŝi lin el mia memoro. Nu, tiel evidenta fiasko de viaj deziroj movu vin (ĉar vi ne povus alie reagi) turni vian amon en furiozon, kaj vian korinklinon en spiton, kaj prenu de mi la vivon: se mi mortos ĉe la okuloj de mia kara edzo, mi opinios mian oferon bona, ĉar eble mia morto pruvos al li, ke mi fidelis al li ĝis la lasta momento.

Dorotea retrovis dume la konscion kaj, aŭskultante la vortojn de Luscinda, komprenis, kiu ŝi estas. Poste, vidante, ke don Fernando retenas ŝin ankoraŭ kaj ne respondas al ŝi, Dorotea stariĝis per pleja fortostreĉo kaj genuiĝis antaŭ li, kaj verŝante multe da belaj kaj afliktaj larmoj, diris:

—Se viaj okuloj, kara sinjoro, ne blindiĝis pro la radioj de la suno troviĝanta inter viaj brakoj, certe vi jam vidis, ke antaŭ vi genuas Dorotea, la senfortuna kaj malfeliĉa ĝis vi volos decidi alie. Mi estas la humila kampulino, kiun via boneco, aŭ via plezuro, volis levi al la honoro nomi ŝin via; mi vivis kontenta inter la limoj de la virto ĝis via sintrudo kaj via ŝajne sincera amo apertis la pordon de mia ĉasto. Mi donis al vi ŝlosilon de mia libero, sed tian donacon vi ne dankis, kion klare montras tio, ke mi devis kaŝi min ĉi tie, kie vi min vidas nun, kaj ankaŭ tio ke mi vidas vin en la situacio, en kiu vi troviĝas. Tamen eĉ ne unu solan momenton vi devus pensi, ke mi venis ĉi tien sur la vojo de la malhonoro: min puŝis nur la aflikto kaj la doloro vidi min forlasita. Vi volis min via, kaj mi estis via tiagrade, ke kvankam mi dezirus nun la kontraŭon, tamen vi ne povus ne aparteni al mi. Konsideru, mia kara sinjoro, ke mi sentas al vi tiel senkomparan amon, ke ĝi povus kompensi la belon kaj la noblecon de la virino, pro kiu vi fortenas vin de mi. Vi ne povas aparteni al la bela Luscinda, ĉar vi estas mia, kaj ŝi ne povas aparteni al vi, ĉar ŝi estas de Cardenio; kaj finfine komprenu, ke pli facilos al vi igi vian koron ami la virinon, kiu vin adoras, ol trudi, ke amu vin virino, kiu sentas al vi abomenon. Vi persekutis mian ĉaston, atakis mian virton per viaj promesoj, konis mian rangon, kaj scias kiel tute mi donis min al via volo; vi ne havas motivon aŭ pretekston por deklari vin trompita. Se mi diras la veron (kaj fakte la veron mi diras) kaj vi estas kristano kaj kavaliro, kial vi tiel longe prokrastas feliĉigi min en la fino, kiel vi feliĉigis min en la komenco? Kaj se vi ne sentas al mi la amon ŝuldatan al vera kaj leĝa edzino, kia mi estas, almenaŭ akceptu min kiel vian sklavinton, ĉar mi

konsiderus min feliĉa kaj bonsorta nur per tio, ke mi apartenus al vi. Ne permesu, forlasante kaj ignorante min, ke mia honoro fariĝu objekto de klaĉoj; ne venenu la old-aĝon de miaj gepatroj, ĉar ili, kiel bonaj subuloj, ĉiam servis lojale al la viaj, kaj ne meritas tian trakton. Se vi opinias, ke via sango degradiĝus, se ĝi miksiĝus kun la mia, pensu, ke ekzistas neniu nobeleco en ĉi mondo, kiu ne iris sur ĉi sama vojo, kaj ke la rangon de la virino oni ne atentis en la plej moŝtaj genealogioj; tiom pli, ke la vera nobeleco konsistas el virto,^[155] kaj se vi tian virton perdas, rifuzante al mi mian justan rajton, mi evidentiĝos pli nobela ol vi. Fine, sinjoro, tiel se vi volas, kiel se vi ne volas, mi estas via edzino; tion konfirmas viaj amoĵuroj, kiuj nek povas, nek devas esti falsaj, se vi fieras posedi tion, kio igas vin disdegni min;^[156] tion konfirmas viaj subskribitaj sindevigoj, kaj la ĉielo, kiun vi alvokis kiel atestanton de viaj promesoj; kaj, se tio ne sufiĉas, via propra konscienco certe levos sian voĉon meze de viaj amuzoj, ripetante la veron, kiun mi ĵus diris, kaj ĉagrenante vin en viaj plej grandaj ĝuoj kaj plezuroj.

La kompatinda Dorotea parolis kun tiom da emocio kaj da larmoj, ke eĉ la kunuloj de don Fernando, kaj la ceteraj ĉeestantoj, ne povis ne afliktiĝi kun ŝi. Don Fernando aŭskultis ŝin sen diri eĉ unu vorton, kaj ŝi finis paroli kaj komencis tiel veadri kaj plorsingulti, ke nur koro el bronzo ne moliĝus ĉe tia elmonstro de doloro. Luscinda fikse rigardis ŝin, multe kompatis ŝin pro ties sufero, kaj same multe admiris ŝian saĝon kaj ŝian belon, ŝi eĉ volis proksimiĝi al Dorotea por konsoli ŝin, sed ne povis ĉar don Fernando forte retenis ŝin ankoraŭ. Plena de honto kaj konsterno, la kavaliro rigardis longan tempon Dorotean, ĝis fine li apertis la brakon kaj diris, lasinte Luscindan libera:

—Vi venkas, bela Dorotea, vi venkas. Ne ekzistas spirito kapabla rezisti tiom da veroj.

Kiam don Fernando delasis Luscindan, tiu, ankoraŭ duonsvena, ne falis teren, ĉar Cardenio, sin lokinta malantaŭ don Fernando por ne esti rekonita de li,^[157] staris proksima kaj, perdante la timon kaj spitante ĉian eventualan danĝeron, subtene prenis Luscindan inter siaj brakoj kaj diris:

—Se la kompata ĉielo fine degnas konsenti al vi kelkan ripozon, mia bela, lojala kaj kuraĝa sinjorino, mi kredas, ke nenie vi ripozos pli sekure ol en ĉi brakoj vin tenantaj nun, same kiel ili vin tenis, kiam la Fortuno permesis al mi nomi vin mia.

Ĉe tiaj vortoj, Luscinda, kiu antaŭe komencis rekoni lin pro ties voĉo, fiksas la rigardon sur Cardenio, certiĝis per siaj okuloj, ke tie efektive li staras kaj preskaŭ ekster si kaj ignorante ĉian regulon de deca konduto, ŝi sin ĵetis brakaperte al lia kolo, metis sian vangon sur la lia kaj diris:

—Jes, kara sinjoro, vi estas la vera mastro de ĉi sklavino, malgraŭ la minacoj farita al mia vivo, kiu dependas de la via.

Strange aperis ĉi spektaklo ĉe la okuloj de don Fernando kaj de la ceteraj ĉeestantoj, plenaj de miro pro tiel neatendita okazo. Dorotea rimarkis, ke don Fernando, paliĝinte, movas la manon direkte al la glavo; ŝi imagis, ke li intencas venĝi sin kontraŭ Cardenio, kaj kun eksterordinara rapido kroĉiĝis al la genuoj de don Fernando, kisis ilin kaj tiel ilin kumprenis, ke li ne povus fari eĉ unu paŝon. Senĉese plorante ŝi diris:

—Kion vi intencas, ho mia sola azilo, en ĉi neimagebla okazo? Ĉe viaj piedoj kuŝas via edzino, dum la virino, kiun vi deziras, troviĝas en la brakoj de sia edzo. Pensu, ĉu vi rajtas aŭ povas detrui kion la ĉielo disponis, aŭ ĉu, anstataŭe, ne pli bonas, ke vi levu al via nivelo la virinon, kiu firma en sia

fido kaj en sia vero, malgraŭ ĉiaj obstakloj, inundas per amaj larmoj la vizaĝon kaj bruston de sia vera edzo... Je Dio kaj por via bono, via elreviĝo, suferata de vi ĉe la vido de aliaj, ne pliigu vian koleron, sed prefere vin mildigu tiel, ke vi povu pace kaj trankvile permesi al la du geamantoj vivi, sen ia ĝeno de via flanko, la tempon destinitan al ili de la ĉielo; tiel vi montrus la sindonon de via glora kaj nobla koro, kaj la mondo vidus ke, ĉe vi, pli fortas la racio ol la pasio.

Dum Dorotea parolis, Cardenio, kvankam li tenis Luscindan en la brakoj, ne deturnis la okulojn de don Fernando kaj pretis, se li vidus lin fari ian agresan movon, defendi sin kaj ataki kiom li povus, eĉ je la kosto de la propra vivo; sed tiam, la amikoj de don Fernando, kune kun la pastro, la barbiro kaj eĉ la brava Sancho Panza, kiuj spektis ĉion okazintan, ĉirkaŭis don Fernandon, petis lin, ke li sin montru kompatema al la ploranta Dorotea, kaj aldonis ke, se kiel ili kredis, ŝi diris la veron, li devus ne rompi ŝian justan esperon kaj konsideri, ke, sendube ne hazarde, sed pro aparta providenco de la ĉielo, ili ĉiuj koincide troviĝas en tiel neantaŭvidita loko; de sia flanko la pastro lin avertis, ke nur la morto povus disigi Luscindan de Cardenio; ke, eĉ se ilin trahakus klingo de glavo, ili mortus kune feliĉaj; ke en tiaj nemodifeblaj cirkonstancoj estus saĝe sin regi kaj venki sin mem, montrante grandanimecon kaj propravole lasante la du geamantojn ĝui la bonon senditan al ili de la ĉielo; ke se li atentus la belon de Dorotea, li vidus, ke malmultaj, aŭ neniu, povus ŝin egali, des malpli superi ŝin; ke al tio li devus aldoni ŝian humilecon kaj ŝian ekstreman profundan amon al li; ke, precipe, li devus memori, ke se li fieras nomi sin kavaliro kaj kristano, li ne povus ne plenumi sian promeson; ke tiel agante, li plenumus sian devon al Dio kaj ricevus la aplaŭdon de la saĝaj, ĉar tiuj scias kaj rekonas, ke kunlige kun la virto, la beleco, eĉ sidanta en senranga virino, havas la privilegion levi sin al la nivelo de ajna moŝteco, sen degradi la personon, kiu prenas belulinon al sia pozicio kiel

egalan parulinon: kaj ke, kiam nepekante oni obeas la potencan vojon de la deziro, oni faras nenion riproĉindan.

Al ĉi argumentoj, la ceteraj ĉeestantoj aldonis tiom da aliaj konsideroj, ke don Fernando (kies brava koro fakte pulsas kun nobla sango) moliĝis kaj cedis al la vero, kiun li ne povus refuti, eĉ se li volus; kaj kiel montris, ke li kapitulacis kaj akceptis la bonajn konsilojn de la aliaj, li kliniĝis, prenis Dorotean inter siaj brakoj kaj diris:

—Leviĝu, mia kara sinjorino, ĉar ne justas vidi ĉe miaj piedoj la damon, kiu regas en mia koro; se ĝis nun miaj faroj ne konfirmis kion mi diras, eble tion preskribis la ĉielo por ke, vidante kiel fidele vi min amas, mi povu reciproki vin, kiom vi meritas. Ne riproĉu min pro mia miskonduto kaj neglekto, ĉar la sama forto, kiu puŝis min konkeri vian amon, klopodis eltiri vin de mia flanko. Kaj kiel pruvo, ke mi diras la veron, turnu vin kaj rigardu al la okuloj de la jam feliĉa Luscinda kaj trovos en ili la ekskuzon de mia eraro; kaj tial, ke ŝi atingis kion ŝi deziris, kaj ke mi trovis en vi la plej gravan al mi, ŝi longe vivu sekura kaj feliĉa kun sia Cardenio, kaj mi preĝos surgenuje al la ĉielo, ke ĝi konsentu al mi la saman feliĉon kun mia Dorotea.

Tion dirinte, li denove ŝin brakumis kaj premis sian vizaĝon al la ŝia kun granda tenero, tre regante sin por ne ekplori en nedubebla montris de amo kaj de pentado. Sed Luscinda, Cardenio kaj preskaŭ ĉiuj ceteraj ne povis reteni la larmojn kaj komencis ilin verŝi tiel abunde, ĉu pro la propra feliĉo, ĉu pro la feliĉo de la aliaj, ke ŝajnis, ke ia granda misfortuno plene trafis ĉiun. Eĉ Sancho Panza larmis, kvankam li poste diris, ke li ploris nur pro tio, ke li vidis, ke Dorotea ne estas, kiel li antaŭe kredis, la reĝino Micomicona, de kiu li esperis tiom da favoroj.

Kelkan tempon daŭris ankoraŭ, kun ĉies ploro, la ĝenerala sento de surpriziteco; poste Cardenio kaj Luscinda genuiĝis antaŭ don Fernando kaj tiel kortuŝe lin dankis pro ties bonvolo al ili, ke li ne sciis kion respondi kaj nur levis kaj brakumis ilin kun multa afablo kaj ĝentilo. Fine li demandis al Dorotea, kiel ŝi trafis tien, en lokon tiel distan de ŝia hejmo. Koncize kaj diskrete ŝi rakontis kion antaŭe ŝi jam diris al Cardenio; kaj tiel plaĉis al don Fernando kaj al ties kunuloj ŝia historio, ke ili volintus ĝin pli longa: tiel ĉarme ŝi rakontis pri siaj propraj misfortunoj. Poste don Fernando parolis pri tio okazinta al li en la urbo, post ol ili trovis sub la korsaĵo de Luscinda la paperon, kie ŝi deklaris, ke ŝi estas edzino de Cardenio kaj ke, sekve, ŝi povus edziniĝi al neniu alia. Don Fernando aldonis, ke li volis mortigi ŝin kaj ke li tion ne faris, ĉar ŝiaj gepatroj lin fortenis; poste, furioza kaj humiligita, li eliris el la domo kun la penso venĝi sin en pli oportuna momento. La sekvantan tagon li eksciis, ke Luscinda forlasis sian gepatran hejmon, kaj ke oni tute ne havis ideon pri kien ŝi iris; fine, post kelke da monatoj, li ricevis la informon, ke ŝi troviĝas en iu monaĥinejo kun la intenco tie resti definitive, se al ŝi ne eblus pasigi la vivon ĉe la flanko de Cardenio; tiam li akompanigis sin per tri kavaliroj kaj iris al la loko, kie ŝi troviĝis; sed li ne volis paroli kun ŝi, ĉar li timis, ke se oni sciis pri lia ĉeesto, oni gardus pli severe la monaĥinejon. Tiel do iun tagon li vidis la pordon aperta —tian okazon li ja atendis— kaj posteniginte du el siaj amikoj gardi la pordon, li kaj la alia kompano eniris en la monaĥinejon, serĉis Luscindan kaj trovis ŝin en la klostro, kie ŝi babilis kun monaĥino; ili ŝin rabis, sen ke ŝi povus rezisti, kaj kondukis ŝin al loko, kie ili sin provizis per ĉio necesa por la vojaĝo. Ili povis fari ĉion ĉi sen ia danĝero, ĉar la monaĥinejo situis en la kamparo, je longa distanco de la vilaĝo. Li aldonis ke, kiam Luscinda vidis sin en lia povo, ŝi svenis, kaj ke, retrovinte la konscion, ŝi nur ploris kaj veis sen diri eĉ unu solan vorton. Tiel, en akompano de larmoj kaj silento ili alvenis al la gastejo, kio al li egaligis alveni al la

ĉielo, kie likvidiĝas kaj havas finon ĉiuj misfortunoj de la tero.

[151] Latine: «ni ĝoju». Ĉi-kuntekste: «kontentiĝon» (pro la alveno de novaj gastoj).

[152] T.e. kun la piedingoj iom pli alte ol ordinare.

[153] Speciala selo por virinoj, simila al seĝo, kun dors-apogilo kaj pied-tabulo.

[154] Oni kutimis porti maskojn kaj vualojn por ŝirmi la vizaĝon kontraŭ suno kaj polvo.

[155] Tre konata sentenco. La latina poeto Juvenalis skribis: «Nobilitas sola est atque unica virtus».

[156] Dorotea aludas la nobelecon de don Fernando. Oni supozis, ke la nobeloj devus esti ankaŭ, kaj precipe, noblaj.

[157] Alia distriĝo de Cervantes. Iom antaŭe li diras, ke «de sia flanko don Fernando same tuj rekonis Cardenion».

Ĉapitro 37

Daŭrigo de la historio de la fama princino
Micomicona, kun aliaj plaĉaj aventuroj

Ĉion ĉi aŭskultis Sancho, ne sen granda ĉagreno, vidante, ke lia espero ricevi ian nobel-titolon solviĝis kiel fumo, ĉar la linda princino Micomicona sin turnis en Dorotean kaj la giganto en don Fernandon, dum lia mastro profunde dormis, zorgante pri nenio. De sia flanko Dorotea ne tre certis, ke ŝia feliĉo ne estas sonĝo; Cardenio sentis la samon, kaj Luscinda ricevis similan impreson. Don Fernando dankis la ĉielon pro la favoro ricevita kaj pro tio, ke la providenco eltiris lin el la komplika labirinto, kie li preskaŭ perdis la animon kaj la honoron; resume, ĉiuj en la gastejo kontentis pro la feliĉa fino de tiel konflikta kaj despera situacio; la pastro, kiel saĝa homo, atribuis al ĉio okazinta ties ĝustan proporcion kaj gratulis la koncernatojn pro la de ili atingita bono; sed plej ĝoja kaj kontenta montriĝis la gastejestrino, ĉar Cardenio kaj la pastro promesis pagi la kostojn —plus la interezojn— de ĉio perdita kaj damaĝita kaŭze de don Quijote. Kiel dirite, nur Sancho sentis sin trista, afliktoplena kaj senespera; tiel do, kun melankolia esprimo li eniris en la ĉambron de sia ĵus vekiĝinta mastro kaj diris:

—Dormu laŭplaĉe, sinjoro Trista Mieno, kaj ne zorgu likvidi ajnan giganton aŭ remeti la princinon en ŝian tronon, ĉar ĉio estas jam aranĝita kaj finita.

—Sendube, ĉar mi havis kontraŭ la giganto batalon tiel grandiozan kaj ferocan, kian mi ne alfrontos en la cetero de mia vivo —respondis don Quijote—. Per retrohako, frap!, mi

forsendis lian kapon sur la plankon, kaj tiom da sango ŝprucis al li, ke ĝi fluis kvazaŭ akvo roja.

—Kvazaŭ ruĝa vino, prefere vi diru —rimarkis Sancho—. Via moŝto sciu, se vi ne scias ankoraŭ, ke la mortinta giganto estas hakita vinsako; la sango, ses aroboj^[158] da ruĝa vino, kiujn la sako havis en sia interno; la detranĉita kapo, la putino min naskinta...; kaj la diablo ĉion forportu.

—Kion vi diras, idioto? —diris don Quijote—. Ĉu vi perdis la saĝon?

—Via moŝto ellitiĝu —respondis Sancho— kaj iru vidi, kian belan laboron vi faris, kaj kiom ni devas pagi; vi vidis ankaŭ la reĝinon turnitan en ordinaran damon nomatan Dorotea, kaj kelke da aferoj, kiuj surprizos vin, se vi bone rimarkos.

—Nenio el tio surprizus min —diris don Quijote—, ĉar, se vi bone memoras, kiam laste ni gastis ĉi tie, mi informis vin, ke ĉion en ĉi loko provokis la ensorĉoj, do ne strange se nun okazus la samo.

—Mi plene konsentus kun via moŝto, se ankaŭ mia bernado estus afero de ensorĉo, kaj ne fakto vera kaj reala —respondis Sancho—. Tiuokaze mi vidis la gastejestron (la saman mastron nunan) teni unu ekstremon de la plejdo, vigle suprentiri min kaj ridi plenbuŝe; eble mi estas idioto kaj pekulo, tamen mi kredas, ke, kie oni komencas rekoni la homojn, tie ekzistas ne ia ensorĉo, sed multe da rompitaĵoj kaj da misfortuno.

—Nu, bone, Dio rimedos tion —diris don Quijote—. Donu al mi la vestaĵojn, ke mi eliru kaj vidu la transformojn, kiujn vi menciis.

Sancho enmanigis al li la pecojn kaj, dum don Quijote sin vestis, la pastro rakontis al don Fernando kaj al la aliaj pri la

frenezo de la hidalgo kaj pri la taktiko uzita por tiri lin de la Mizera Roko, kie li antaŭe sidis pro imagaj disdegnoj de sia damo. La pastro sciigis al ili ankaŭ la pliparton de la aventuroj, kiujn Sancho jam komunikis al li, kaj la aŭskultantoj ne malmulte ridis kaj miris, ĉar ili pensis, kiel la tuta mondo, ke temis pri la plej stranga speco de freneco sidanta en difektita cerbo. La pastro aldonis, ke pro tio, ke la bona fortune de Dorotea nebligis la daŭrigon de la projekto, oni devus elpensi kaj efektiviĝi alian por konduki la hidalgon al ties vilaĝo. Cardenio proponis, ke oni plu utiligu la originalan projekton, kaj aldonis, ke Luscinda povus transpreni la rolon de Dorotea.

—Ne —diris don Fernando—, oni ne faru tiel. Mi deziras, ke Dorotea ludu ankoraŭ sian rolon, kaj se la vilaĝo de ĉi bona hidalgo ne tre distas, mi tre ĝojos kontribui al lia resaniĝo.

—De ĉi tie, ĝi distas ne pli ol du tagojn.

—Nu, eĉ se ili estus pli, mi same ĝojos fari la vojaĝon, se konsideri la bonon, kiun ni celas.

Ĉi-momente aperis don Quijote armita per siaj tutaj feroj, kun la ronda ŝildo ĉe la brako, la lanco en la mano kaj apogita sur la planko, kaj la kasko de Mambrino, kvankam deformita pro la battoj, sur la kapo. Don Fernando kaj la aliaj miris ĉe la stranga figuro de don Quijote, ĉe lia magra kaj flava vizaĝo duonmejlona longa, ĉe la manko de interkongruo de liaj armiloj kaj ĉe lia digna teniĝo, kaj ili silentis, atendente, ke li parolu unua; fine don Quijote kun grandaj soleno kaj aplombo diris, fiksante la rigardon sur la linda Dorotea:

—Ĉi ŝildisto mia informis min, bela sinjorino, ke Via Grandeco ekstermiĝis, ke via persono pereis, ĉar vi, iam reĝino kaj granda damo, turniĝis en simplan pucelon. Se tia

ŝanĝo okazis pro ordono de via patro, la reĝo magiisto, ĉar li timis, ke mi ne kapablus doni al vi la necesan kaj ŝuldatan helpon, mi asertas, ke eĉ ne la duonon de sia arto li sciis aŭ scias, kaj ke li apenaŭ familiariĝis kun la kavaliraj historioj; ĉar se li estus leginta kaj studinta ilin longe kaj atente kiel mi, li trovintus ĉiupaŝe, ke aliaj kavaliroj, kies famo ne egalas la mian, efektivigis taskojn multe pli riskajn. Ja, mortigi giganteton, kiom ajn li arogantas, apenaŭ valoras; fakte, antaŭ ne longe mi mem batalis kontraŭ li... nu, mi preferas silenti, por ke oni ne diru, ke mi mensogas; sed la ĉion rivelanta tempo diskonigos la veron en la plej neatendita momento.

—Kontraŭ vinsakoj vi batalis, ne kontraŭ giganto —diris tiam la gastejestro. Sed don Fernando ordonis lin silenti kaj neniel interrompi la dirojn de don Quijote; kaj la hidalgo daŭrigis:

—Mi fine diras, moŝta sinjorino senheredigita, ke, se pro la dirita motivo via patro faris al vi ĉi metamorfozon, vi devus konsideri ĝin nenecesa, ĉar en la mondo ne ekzistas danĝero, tra kies obstakloj mia glavo ne trabatus vojon al mi. Apenaŭ pasos kelke da tagoj ĝis, faliginte teren la kapon de via malamiko, mi surmetos al vi denove la kronon.

Li ĉesis paroli, atendante la respondon de la princino. Dorotea jam konis la intencon de don Fernando daŭrigi la mistifikon ĝis la enkonduko de la hidalgo en ties hejmon, do ŝi respondis kun gracia seriozeco:

—Kiu ajn diris al vi, Kavaliro de la Trista Mieno, ke mi aliformiĝis, tute ne diris la veron, ĉar hodiaŭ mi estas la sama virino kiel hieraŭ. Efektive, kelkaj feliĉaj okazintaĵoj faris al mi ŝanĝon: la plej bonan, kiun mi povus deziri; sed cetere, mi estas la sama persono kiel antaŭe kaj havas la saman intencon helpi al mi per la forto de via kuraĝa kaj nevenkebla brako. Tiel do, kara sinjoro, faru al mi la

komplezon redoni la honoron al la viro min generinta, kaj konsideru lin sagaca kaj prudenta, ĉar per sia scio li trovis sekuran kaj facilan rimedon kontraŭ mia misfortuno. Mi kredas, sinjoro, ke, sen via interveno, neniam mi atingus mian nunan feliĉon; kaj ĉi-rilate mi ja diras la puran veron, kion la pliparto de ĉi sinjoroj povus atesti. Kion ni devas fari nur, estas ekiri morgaŭ sur la vojo, ĉar hodiaŭ ni havas apenaŭ tempon por vojaĝi. Kaj pri la cetera bona fortune, kiun mi esperas, mi fidos je la volo de Dio kaj je la kuraĝo de via koro.

Tion esprimis la saĝa Dorotea kaj, aŭdinte ŝin, don Quijote sin turnis al Sancho kaj laŭtis kun nekaŝita kolero:

—Nun mi diras al vi, Sancho fripono, ke vi estas la plej aĉa kanajlo de Hispanujo. Latrono, vagabondo, ĉu vi ne ĵus diris al mi, krom aliaj absurdoj metintaj min en la plej grandan konfuzon de mia vivo, ke ĉi princino turniĝis en pucelon nomatan Dorotea, kaj ke la kapo kiun, kiel mi kredas, mi dehakis al giganto, estas la putino vin naskinta? Mi ĵuras je... —li rigardis al la ĉielo kaj interpretis la dentojn—, ke la mano min jukas fari el vi kaĉon tian, ke ĉiuj mensogaj ŝildistoj vagontaj de nun en la mondo lernos esti diskretaj.

—Trankviliĝu, kara sinjoro —respondis Sancho—. Eble mi eraris koncerne la ŝanĝiĝon de la princino Micomicona, sed rilate al la kapo de la giganto, nu, al la disŝiro de la felsakoj, kaj al tio, ke la sango estas ruĝa vino, mi ne eraras, je Dio, ĉar tie, ĉe la piedo de via lito kuŝas la hakitaj sakoj, kaj la ruĝa vino turnis vian ĉambron en lagon. Se vi ne kredas min, vi konvinkiĝos, kiam oni fritos la ovojn,^[159] t.e. kiam lia moŝto la sinjoro gastejestro prezentos al vi la noton de la damaĝoj. Pri tio, ke la sinjorino reĝino troviĝas en la sama stato kiel antaŭe, mi kore ĝojas, ĉar mi ricevos mian parton, kiel ĉiu la sian.

—Nun mi devas diri al vi —replikis don Quijote—, ke vi estas idioto; pardonu min pro la insulto kaj punkto.

—Punkto —ripetis don Fernando—. Oni ne plu parolu pri la afero. Kaj ĉar la sinjorino princino deziras ekiri morgaŭ, tial, ke hodiaŭ estas jam tarde, oni tiel faru; ni povos pasi ĉi nokton en agrabla babilado ĝis la matenruĝo, kaj morgaŭ ni ĉiuj akompanos sinjoron don Quijote, ĉar ni deziras ĉeesti la grandiozajn kaj riskoplenajn prodaĵojn, kiujn certe li plenumos en ĉi granda entrepreno sia.

—Al mi koncernas servi kaj akompani vin —respondis don Quijote—, kaj mi tre dankas pro la favoro al mi farita kaj pro via bona opinio pri mia persono; tian opinion mi klopodos pravigi, eĉ se mi pagos per mia vivo, aŭ per io plia, se eble.

Multe da komplimentoj kaj sinproponoj ŝanĝis inter si don Quijote kaj don Fernando; sed ilin interrompis vojaĝanto tiam eniranta en la gastejon, viro ĵus veninta, laŭ la vesto, el lando de maŭroj, ĉar li portis bluan kazakon sen kolumo, kun duonmanikoj kaj kurtaj baskoj, kuloton kaj ĉapon de la sama blua koloro, paron da duonbotoj daktilkoloraj kaj maŭran cimitaron pendantan de balteo. Lin sekvis surazene virino vestita laŭ la maŭra stilo, kun la vizaĝo kovrita kaj kun unu vualo sur la kapo; ŝi portis ĉapeton el brokaĵo kaj burnuson, kiu envolvis ŝin de la ŝultroj ĝis la piedoj. La viro vidiĝis iom pli ol kvardekjara, fortika, de bela kresko, kun la vizaĝo iom suntanita, longaj lipharoj kaj zorge pritondita barbo; unuvorte, li aspektis tia, ke, se li portus bonan veston, oni juĝus lin homo moŝtnaskita kaj altranga. Enirante, li petis ĉambron kaj, kiam oni diris al li, ke en la gastejo troviĝas eĉ ne unu ĉambro libera, li montris sin tre afliktita; tamen li alpaŝis al sia kunulino en maŭra vesto kaj helpis ŝin descendi de la azeno. Luscinda, Dorotea, la gastejestrino, ties filino kaj Maritornes, altiritaj de ŝia vesto, kian ili neniam antaŭe vidis, ĉirkaŭis la maŭrinon; kaj Dorotea, kiel kutime

simpatia, ĝentila kaj plena de takto, vidante, ke li kaj lia kunulino afliktiĝas pro la manko de ĉambroj, diris al ŝi:

—Ne tre ĉagreniĝu, kara sinjorino, pro la neekzisto ĉi tie de konvena loko kaj de komforto, ĉar same okazas en ĉiuj gastejoj; tamen, se al vi plaĉus loĝi kun ni —kaj ŝi almontris Luscindan—, eble vi ne renkontus pli bonan akcepton en via tuta vojaĝo.

La vualita virino ne respondis kaj nur stariĝis, krucis la manojn sur la brusto kaj dankomontre klinis la kapon kaj la torson. Pro ŝia silento la aliaj opiniis ŝin maŭrino ne scianta paroli en kristana lingvo. Ĉe tio ŝia kunulo, ĝis tiam okupata per aliaj aferoj, alpaŝis, kaj vidante, ke la aliaj ĉirkaŭas ŝin, kaj ke ŝi respondas nenion, diris:

—Sinjorinoj, ĉi pucelo apenaŭ komprenas nian lingvon kaj scias nur la sian; tial, ŝi nek povis nek povas respondi viajn demandojn.

—Ni nur proponis al ŝi —respondis Luscinda— akcepti ĉi-nokte nian akompanion kaj dividi kun ni la lokon, kie ni nin aranĝos, kaj kie ni havigos al ŝi tiom da komforto, kiom la cirkonstancoj permesos, des pli, ke oni devas helpi ĉiun fremdan, precipe virinon, se helpon ili bezonas.

—En ŝia nomo kaj en la mia —li diris— mi kisas al vi la manon, sinjorino, kaj taksas vian proponon tiel alte kiel ĝi meritas; sendube temas pri granda favoro, se konsideri, ke ĝi venas en la nunaj cirkonstancoj kaj de moŝtaj personoj, kiaj vi ŝajnas.

—Diru al mi, sinjoro —demandis Dorotea—. Ĉu la damo estas kristana aŭ maŭra?

—Maŭra laŭ korpo kaj vesto, sed profunde kristana en sia animo, ĉar ŝi havas tre grandan deziron fariĝi tia.

—Ĉu oni do ne baptis ŝin ankoraŭ? —demandis Luscinda.

—Ni ne havis la okazon, de kiam ŝi forlasis sian landon kaj hejmon: Alĝerio —li respondis—. Kaj ĝis nun ŝi ne troviĝis en tia mortodanĝero, ke ŝi devus ricevi la bapton eĉ sen esti instruita rilate al la ceremonioj, kies scion postulas nia Patrino, la Sankta Eklezio; sed mi esperas, ke Dio baldaŭ donos al ni la okazon, ke oni ŝin baptu kun la formalajoj ŝuldata al ŝia rango, pli alta ol ŝia vesto aŭ la mia montras.

Ĉi vortoj eĉ pli vekis en la aliaj la deziron scii pri la maŭrino kaj ties kunulo; sed ili ne volis lin demandi tiam, ĉar en tiu nokta horo ŝajnis pli konvene havigi al la paro ripozon ol demandi pri ties vivo. Dorotea prenis ŝin je la mano, sidigis ŝin ĉe sia flanko kaj petis, ke ŝi demetu la vualon. Ŝi rigardis sian kunulon, kvazaŭ ŝi demandus per la okuloj kion oni diris kaj kion ŝi devus fari; li respondis arabe, ke oni petis ŝin demeti la vualon, kaj li aldonis, ke ŝi tion faru; ŝi do senvualigis sin kaj rivelis vizaĝon tiel belan, ke Dorotea trovis ŝin pli bela ol Luscinda, kaj Luscinda pli bela ol Dorotea, dum la ceteraj ĉeestantoj pensis, ke nur la mieno de la maŭrino povus egali la mienon de Luscinda kaj Dorotea; kaj pluraj trovis ŝin kelkrilate eĉ la plej bela el la tri. Nu, ĉar la belo havas la privilegion gajni al si ĉies koron kaj volon, oni tuj cedis al la deziro komplimenti kaj servi la belan maŭrinon.

Don Fernando demandis al ŝia kunulo pri ŝia nomo, kaj li respondis, ke ŝi nomiĝas Lela Zoraida; sed kiam ŝi aŭdis lian respondon, ŝi komprenis kion la kristano demandis, kaj ŝi aldiris rapide kaj gracie, sed ankaŭ angore:

—Ne, Zoraida ne; María, María —komprenigante, ke ŝi nomiĝas, ne Zoraida, sed María.

Ŝiaj vortoj, kaj la emocio kun kiu ŝi ilin prononcis, provokis la verŝon de larmoj ĉe la ĉeestantoj, ĉefe ĉe la virinoj, kies naturo estas pli molkora kaj kompatema. Luscinda varme ŝin brakumis kaj diris: «Jes, jes: María», kaj la maŭrino respondis: «Jes, jes: María; Zoraida *macange*», kiu lasta signifas «ne».

Dume la nokto falis kaj sub la instrukcioj de la kompanoj de don Fernando, la gastejestro ĉiel klopodis prepari al ili la plej bonan manĝon pretigeblan. Tiel do, kiam la horo venis, ĉiuj sidiĝis ĉe unu longa komuna tablo, ĉar en la gastejo ne ekzistis tabloj rondaj aŭ kvadrataj, kaj la honoran lokon oni destinis al don Quijote, malgraŭ ties rifuzoj. Li volis ĉe sia flanko sinjorinon Micomicona, tial ke ŝi troviĝis sub lia protekto. Apud ŝi sidiĝis Luscinda kaj Zoraida, kaj fronte al ili don Fernando kaj Cardenio kun la ĵusveninto kaj la ceteraj kavaliroj; ĉe la flanko de la damoj sidiĝis la pastro kaj la barbiro, kaj tiel ili manĝis kun granda kontento, des pli, kiam ili vidis, ke don Quijote ĉesas manĝi kaj, posedata de la sama spirito, kiu iam movis lin longe paroli al la kapristoj, komencis diri:

—Vere, sinjoroj, oni devas rekoni, ĉion konsiderante, ke la membroj de la ordeno de la vaganta kavalirismo travivas plej eksterordinarajn aferojn. Efektive, inter la homoj vivantaj en la mondo, kiu, enirinte tra la pordo de ĉi kastelo kaj trovante nin kune en nia nuna aspekto, divenus kio vere ni estas? Kiu povus kredi, ke ĉe mia flanko sidas la granda reĝino konata de ni ĉiuj, kaj ke mi estas la Kavaliro de la Trista Mieno, kies nomon la buŝo de la famo ĉie distrumpetas? Nedubeble do, ĉi arto aŭ profesio pli grandas ol la ceteraj elpensitaj de la homo, kaj ju pli da danĝeroj ĝi kunportas, des pli alte ni devas ĝin taksi. Iru for de ĉi tie, kiu asertus, ke la letroj pli valoras ol la armoj! Mi respondus, kiu ajn li estus, ke li ne scias kion li diras. Efektive, li prezentus la argumenton, kaj al ĝi ĉefe sin apogus, ke la faroj de la

spirito superas la farojn de la korpo, kaj ke la armojn nur per la korpo oni manipulas, kvazau temus pri ŝarĝista okupo, por kies plenumo oni bezonas nur fizikan forton; kvazaŭ en nia profesio en la tiel nomata kampo de la armoj ne necesus granda inteligento por la efektivigo de kuraĝaj entreprenoj; kaj kvazaŭ militestro komandanta armeon aŭ defendanta sieĝitan urbon ne laborus tiel per sia inteligento kiel per sia korpo. Ĉu per la nura fizika forto oni povus diveni aŭ scii la intencojn, planojn, stratagemojn kaj embuskojn de la malamiko, aŭ preventi timatajn danĝerojn? Sekve do, se por la armoj, kiel por la letroj, necesas la inteligento, ni vidu nun, kiu faras pli grandan mensan laboron, ĉu la letristo aŭ la soldato. Ni povos tion scii, se ni konsideras la celon letristan kaj la celon soldatan kaj konsentas, ke ju pli noblas la serĉata celo, des pli alte oni devas ĝin taksi. Estas celo kaj objekto de la profanaj letroj (mi ne parolas nun pri la religiaj, kies celo, nekomparebla kaj infinita, konsistas en tio, inspiri la animojn, ke ili atingu la ĉielon) distribui nepartie la juston, doni al ĉiu ties rajton, interpreti la leĝon kaj klopodi, ke oni ĝin observu, kio certe meritas laŭdon pro siaj grandanimaj kaj noblaj streboj, sed ne tiel multe kiel la kariero de la armoj, kies objekto estas la paco, la pleja bono, kiun la homoj povas deziri en ĉi mondo: tial, la unuan bonan novaĵon, ricevitan de la mondo kaj de la homoj, komunikis la anĝeloj en la nokto, kiu estis nia tago, ^[160] kiam ili kantis en la aero: «Gloron al Dio en la alto kaj pacon sur la tero al la homoj de bona volo»; tial, la plej bona majstro sur la tero kaj en la ĉielo instruis al siaj disĉiploj kaj adeptoj saluti jene en la momento eniri en ajnan domon: «Paco regu en ĉi hejmo», kaj ofte Li diris al ili: «Mi donas al vi mian pacon; mian pacon mi lasas al vi; la paco estu ĉe vi», kiu paco, donita de tia mano, egalas al juvelo: tia juvelo, ke, se ĝi mankas en la ĉielo aŭ sur la tero, neniam bono povas ekzisti. Ĉi paco estas la vera celo de la milito, ĉar armoj kaj milito signifas la samon. Se ni akceptas do la veron, ke la milito celas la

pacon, kaj ke sekve ĝi superas la celon de la letroj, ni traktu nun pri la korpaj suferoj de la eruditoj kaj de la soldatoj, kaj ni vidu, kies suferoj pli grandas.

Don Quijote tiel prudente kaj racie sin esprimadis, ke tiam neniu el la aŭskultantoj opinius lin freneza; kontraŭe: la pliparto, kavaliroj ligitaj al la kariero de la armoj, aŭskultis lin kun granda plezuro. Li plu parolis:

—Mi asertas do, ke la suferoj de la studentoj estas la jenaj: ĉefe mizero (nu, ne ĉiuj malriĉas, sed ni allasu la ekstreman kazon), kaj kiam mi diras, ke ili suferas mizeron, mi kredas, ke nenion plian oni povus aldoni por indiki ilian misfortunon, ĉar la malriĉan trafas nenio bona. Li elportas la diversajn aspektojn de la mizero: foje malsato, foje frido, foje nudeco, foje ĉio kune; tamen lia situacio ne fariĝas senespera, ĉar iel li manĝas, eble iom pli malfrue ol oni kutimas, eble sin nutrante per la postlasaĵoj restintaj sur la tablo de la riĉaj, eble serĉante la supon,^[161] kio lasta konsistigas la plejan mizeron de la studento. Al li ne mankas alies braĝujo aŭ kameno, kies varmo ne tre intensas sed almenaŭ iom mildigas lian fridon; kaj fine, li dormas subtegmente dum la nokto... Mi ne volas detale mencii kelke da negravaĵoj, nome, la manko de ĉemizoj, la nesufiĉo de ŝuoj, la kaduka kaj fadenmontra stato de la vesto, nek kiel avide li ŝtopas al si la stomakon, kiam hazarde li partoprenas en festeno. Sur ĉi kruta kaj dorna vojo la studento stumblas, falas, sin levas kaj falas denove, sed fine akiras la deziratan diplomon; kaj tiam, pasinte inter tiaj Scilaj, Karibdaj kaj Sirtoj, multaj studentoj, kvazaŭ pelitaj de la favora vento de la fortuno (kiel ni ofte vidas) fine regas kaj komandas la mondon de sur seĝo kaj ŝanĝas sian malsaton en plenan stomakon, sian fridon en plaĉan friskon, sian nudecon en belajn kostumojn kaj sian surmatan dormon en ripozon inter holandaj kaj damaskaj tukoj: ĝuste meritita rekompenco al ilia kuraĝo.

Sed iliaj suferoj, se komparitaj kun la suferoj de la soldato, tre etas en ĉiuj aspektoj, kiel mi tuj klarigos.

[158] Hispane «arroba»: malnova pez-unuo. Unu arobo egalas 11,50 kilogramojn.

[159] Proverba esprimo; devenas de rakonto kun la jena argumento: En gastejo, bubo ŝtelis paton, envolvis ĝin kaj ekiris al la pordo por forkuri; tiam aperis la gastejestrino kaj demandis al li, kion li portas. «Vi scios, ĉe la horo friti la ovojn», respondis la knabo.

[160] Ĉar en tiu nokto, laŭ la kristanismo, naskiĝis la Filo de Dio por meti lumon en la homan tenebron.

[161] Almozante pri ĝi ĉe la konventoj.

Ĉapitro 38

Pri la kurioza parolado de don Quijote rilate al la
armoj kaj la letroj

Don Quijote diris daŭrige:

—Ĉar ni komencis konsiderante la situacion de la studento, lian mizeron kaj ties diversajn aspektojn, ni traktos, ĉu la soldato pli riĉas, kaj ni vidas, ke li estas la plej paŭpera en la mondo, tial, ke li devas subteni sin per la mizera soldo, kiun li ricevas tarde aŭ neniam, aŭ per tio, kion li povas marodi propramane tre riskante sian vivon kaj konsciencon; kaj kelkfoje lia senvestiteco estas tia, ke ia saĝo ŝirita taŭgas al li samtempe kiel ĉemizo kaj uniformo; en la mezo de la vintro, en kamparo aperta, li defendas sin kontraŭ la rigoroj de la vetero per nur la elspiraĵoj de sia buŝo, kiuj, venante de vaka loko, certe fridas spite al la naturaj leĝoj. Sed falas la nokto, kaj tiam ni vidas, ke por ripozi post tiom da malkomforto, li disponas liton, kiu, se ne pro lia kulpo, neniam montriĝas larĝo-manka, ĉar li povas mezuri sur la tero kiom da futoj li volas kaj tie ruli sin laŭplaĉe sen timi la ĉifiĝon de la tukoj. Fine venas la tago kaj la horo, kiam oni surmetas al li la doktoran bireton, faritan el ĉarpioj, por kuraci la vundon de kuglo eble trapasinta lian frunton aŭ kripliginta lin je brako aŭ je kruro. Kaj se ĉio ĉi ne okazas kaj la kompata ĉielo gardas lin viva kaj sana, li statos tiel mizera kiel antaŭe kaj devos interveni en aliaj dueloj kaj bataloj kaj venki senescepte por iom prosperi; sed tiaj mirakloj apenaŭ vidiĝas. Nu, sinjoroj, se vi konsideris la aferon, diru, kiomfoje superas la viktimoj de la milito la nombron de ĝiaj profitantoj? Sendube vi respondos, ke tia komparo ne eblas, ĉar oni ne povas kalkuli la milit-pereintojn, dum nur tri

ciferoj^[162] sufiĉus por indiki la kiomon de la prosperaj soldatoj vivaj.

»Ĉe la juĝistoj okazas la malo, ĉar ĉiuj bele enpoŝigas la monon salajran, se ne menciis la ŝmiran; tiel do, kvankam pli grandas la suferoj de la soldato, ties rekompenco estas multe pli eta. Al tio oni povus respondi, ke pli facilas premii du mil juĝistojn ol tridek mil soldatojn; la juĝistojn oni rekompencas per postenoj destinitaj al ilia profesio, dum la soldatojn oni povus premii nur per la posedaĵoj de la estro, kiun ili servas. La fakto, ke ĉi tia rimedo neblas, plifirmigas mian argumentadon.

»Tamen ni flanklasu ĉi tion, ĉar temas pri labirinto, kies pordo apenaŭ troveblas; kaj ni traktu denove la superecon de la armoj antaŭ la letroj, afero ankoraŭ ne decidita, se konsideri la forton de la argumentoj prezentitaj de unu flanko kaj de la alia. La kleruloj diras, interalie, ke, sen la letroj, la armoj ne povus ekzisti, ĉar ankaŭ la milito havas siajn leĝojn kaj rigore obeas ilin, kaj la leĝoj apartenas al la jurisdikcio de la letroj kaj de la eruditoj. Al tio respondas la armoj, ke la leĝo ne efikus sen ili, ĉar per la armoj oni defendas la landon, konservas la regnon, gardas la urbojn, tenas la vojojn sekuraj kaj alĉasas la piratojn de la maro; unuvorte, la landoj, la regnoj, la monarkioj, la urboj, la vojoj de la tero kaj la maro estus submetitaj al la danĝero kaj konfuzo propraj al la milito, dum tiu daŭras kaj uzas siajn privilegiojn kaj sian forton. Kaj estas pruvite, ke tion plej kostan oni taksas aŭ devas taksi, plej alte. Por atingi renomon en la letroj necesas tempo, noktoj da studo, malsato, nudeco, kapturoj, misdigestoj kaj aliaj similaj aferoj, kiujn mi jam parte menciis. Aliflanke, por fariĝi bona soldato, li devas trasuferi la samon kiel la studentoj, sed ĝis tia grado, ke komparo ne eblas, ĉar ĉiupaŝe li trovas sin ĉe la rando de la morto.

»Ĉu iu el la timoj, kiuj pro mizero aŭ malsato plagas aŭ afliktas la studenton, povas egali la timon sentatan de soldato surpostene aŭ gardostare, kiam en ia reduto aŭ pozicio li scias, ke la malamikoj subminas en la direkto al lia loko, kaj neniapretekste li povas apartiĝi aŭ fuĝi de la danĝero tiel proksime lin minacanta? Li povas nur informi sian kapitanon pri la danĝero, esperi, ke tiu alfrontos la situacion per kontraŭmino, kaj dume stari kviete, atendente kaj timante ĉu li subite leviĝos senflugile al la nuboj kaj kontraŭvole refalos en la profundon. Kaj se ĉi danĝero ŝajnas al vi eta, ni vidu, ĉu ĝin egalas aŭ superas tio, ke du galeroj venas en poban kolizion unu kun la alia meze de la vasta maro, interkroĉiĝas kaj lasas al la soldato nur la spacon de du futoj da tabulo ĉe la ŝipantaŭo; kaj kvankam li vidus fronte al si, je lanco-longa distanco, ke lin minacas tiom da instrumentoj de morto, kiom da kanonoj faŭkas de la kontraŭa ŝipo, kaj kvankam li scias, ke ĉe la unua mispaŝo li irus viziti la profundan sinon de Neptuno, tamen kun aŭdaca koro, puŝate de la honoro, li almetas sin al la risko fariĝi celobjekto de densa arkebuza pafado kaj sin ĵetas paŝi sur tiel streta tabulo ĝis la malamika ŝipo. Kaj eĉ pli admirindas, ke apenaŭ unu soldato elfalas tien, de kie li ne povos levi sin denove ĝis la tago de la lasta juĝo, alia okupas tuj lian lokon, kaj se siavice ankaŭ li falas, alia, kaj ankoraŭ alia sekvas, sen ia interspaco inter morto kaj morto: la plej granda montro de kuraĝo kaj sinofero trovebla en la hazardoj de la milito.

»Benatu la tempo, kiam mankis la terura furio de ĉi demonaj maŝinoj, la artilerio, kies inventisto, mi firme kredas, nun ricevas en la infero la rekompencan pro tiel monstra elpenaĵo, kiu permesas al brako kanajla kaj poltrona preni la vivon de brava kavaliro, ĉar li ne konscias kiel aŭ de kie, kiam lia koro plenas de impeto kaj aŭdaco, trafas lin hazarda kuglo (pafita eble de viro ekfuĝinta en teruro pro la flamo kaŭzita de la malŝargo de lia infera maŝino) kaj en unu

momento metas finon al la pensoj kaj la ekzisto de persono, kiu meritis jarcentojn da vivo. Kiam mi meditas pri tio, mi inklinas konfesi, ke doloras al mi en la koro, ke mi alprenis la profesion de vaganta kavaliro en ĉi abomeninda epoko nia; ĉar, kvankam nenio min timigas, tamen donas al mi kelkan zorgon la penso, ke pulvo kaj plumbo povas preni de mi la ŝancon gajni sur la tuta konata tero famon kaj renomon per la kuraĝo de mia brako kaj la eĝo de mia glavo. Sed la ĉielo faru laŭvole: se mi atingos la celon, oni min pli alte taksos, ĉar mi alfrontis pli da danĝeroj ol la vagantaj kavaliroj de la pasintaj tempoj.

Dum la aliaj manĝis, don Quijote diris ĉi longan paroladon kaj forgesis preni eĉ unu solan plenbuŝon, kvankam Sancho Panza kelkfoje urĝis lin manĝi, aldonante, ke poste li havus sufiĉan tempon por paroli laŭplaĉe. Liaj aŭskultantoj denove bedaŭris, ke viro laŭŝajne diskreta kaj saĝa ĉe la trakto de ajna temo, tute perdas la kapon, kiam la objekto estas lia damninda kaj fatala kavalirismo. La pastro komentis, ke li tre pravis rilate al siaj diroj favoraj al la armoj, kaj ke li mem, kvankam letrulo kaj diplomito, havas la saman opinion. Oni finis manĝi, demetis la tablotukon, kaj la gastejestrino, ties filino kaj Maritornes iris aranĝi la mansardaĉon de don Quijote, kie, oni decidis, la damoj pasigus la nokton; tiam don Fernando petis la ĵusveninton rakonti la historion de sia vivo, kaj aldonis, ke ĝi certe estas stranga kaj interesa, kiel jam ekmontris lia alveno kun Zoraida. Li respondis, ke tre volonte li tion farus, ke li timas nur, ke lia historio eble tedos ilin, kion li bedaŭrus, sed ke ĉiuokaze li rakontos ĝin por ne ŝajni malĝentila. La pastro kaj la aliaj lin dankis kaj petis lin komenci: kaj vidante ilin insisti, li diris, ke ne necesas tiom da afablaj petoj, kie oni rajtas postuli.

—Viaj moŝtoj atentu do; vi aŭskultos veran rakonton, eble superan al la fikciaj verkoj, kies intrigo ordinare konsistas el arte fantaziaj elementoj.

Ĉe tio oni silentis kaj pretis aŭskulti; kaj vidante, ke ili senmove atendas, li komencis paroli kun agrabla kaj serena voĉo:

[[162](#)] T.e., ajna nombro el tri ciferoj.

Ĉapitro 39

Kie la kaptito rakontas la historion de sia vivo kaj de siaj aventuroj

—En vilaĝo de la montoj de León originis mia familio, al kiu la naturo montriĝis pli donacema kaj favora ol la fortune, kvankam en tiel mizera lando mia patro havis la famon esti riĉa; kaj vere li riĉus, se li konservus sian kapitalon tiel bone, kiel li ĝin elspezadis. Ĉi inklino malavari venis al li de tio, ke li soldatis kiam juna, kaj la soldateco estas skolo, kie la avara lernas regali, kaj la regalema disipi; kaj, kvankam kelkfoje troviĝas monavidaj soldatoj, ili raras kiel la monstroj. Mia patro transpasis la limon de la regalemo kaj proksimiĝis al la rando de la prodigo, kio tute ne utilas al edzo, kies filoj heredos lian nomon kaj staton. Mia patro havis tri knabojn, ĉiujn en la aĝo akiri profesion; vidante, laŭ propra konfeso, ke li ne povas rezisti al sia natura inklino, li decidis senigi sin de la kaŭzo de sia regalemo kaj prodigo, t.e. li volis transdoni sian havon, tiel, ke eĉ se Aleksandro^[163] mem same farintus, li fine ruiniĝus. Iam do li vokis siajn tri filojn en unu ĉambron kaj alparolis nin jene:

»—Por certigi al vi, ke mi vin amas, sufiĉas, ke mi diru, ke vi estas miaj filoj; kaj por konvinki vin, ke mi vin ne amas, sufiĉas, ke mi diru, ke pro mia prodigemo mi ne kapablas konservi vian havon. Sed por ke vi sciu, ke mi amas vin kiel patro, kaj ke mi ne volas ruinigi vin kiel duonpatro, mi intencas fari por via bono ion, kion mi jam primeditis longan tempon kaj decidis post matura konsiderado. Vi estas jam en la aĝo preni al vi profesion, aŭ almenaŭ vin dediĉi al ia laboro povanta doni en la futuro honoron kaj profiton. Mia plano konsistas en tio, disdividi mian havon en kvar tute

egalajn partojn, doni po unu al ĉiu el vi, kaj rezervi al mi la lastan parton, ke ĝi min subtenu tiel longe kiel la ĉielo bonvolos konservi min viva. Sed mi deziras, ke, post ol vi ricevos vian parton, ĉiu iru la vojon, kiun mi indikos. Ni havas en Hispanujo proverbon, kies saĝo estas, laŭ mia scio, tre granda, kiel, cetere, grandas la saĝo de la tuta proverbaro, ĉar ĝi konsistas el lakonaj sentencoj inspiritaj de longa kaj profunda viv-sperto. Nu, la aludita proverbo diras: «Aŭ Eklezio, aŭ maro, aŭ reĝa palaco», kio signifas, ke, se oni deziras povon kaj riĉon, oni devas entrepreni eklezian karieron, aŭ navigi komercante, aŭ servi la reĝon en ties domo, ĉar, laŭdire «pli valoras pano de reĝo ol favoro de moŝtulo». Per ĉio ĉi mi volas diri, ke unu sin dediĉu al la letroj, alia al la komerco, kaj la lasta servu la reĝon en ties militoj, se konsideri, ke ne facilas ofici en la palaco mem; ĉar, kvankam la milito ne havigas multe da riĉoj, tamen ĝi alportas ordinare grandan famon kaj renomon. Antaŭ ol pasos ok tagoj, mi donos al ĉiu ties respektivan parton en la formo de mono, sen defraŭdi vin eĉ per unu groŝo, kiel vi vidos. Diru nun, ĉu vi deziras sekvi mian konsilon kaj proponon.

»Ĉar mi estis la plej aĝa, li petis min respondi, kaj mi diris, ke li devus ne distribui sian monon, sed elspezi ĝin laŭvole, pro tio, ke ni estas junaj kaj kapablas ĝin perlabori; sed fine mi konsentis plenumi lian deziron kaj aldonis, ke mi preferus la karieron de la armoj, servante tiel Dion kaj mian reĝon. Mia dua frato faris al li la samajn admonojn, kiel mi, kaj poste elektis vojaĝi al Indioj kaj investi sian parton en komercaĵoj. La plej juna kaj, kiel mi kredas, la plej saĝa, diris, ke li entreprenus la eklezian karieron, aŭ irus al Salamanca por fini tie la universitaton.

»Post ol ni interakordiĝis kaj ĉiu elektis sian profesion, nia patro nin brakumis kaj plenumis sian promeson ĝuste tiel frue kiel li diris; li donis al ĉiu, kiel mi memoras, tri mil

dukatojn, ĉar iu onklo nia jam antaŭe aĉetis la bienon, por ke ĝi restu en la familio, kaj pagis per kontanta mono. Ni tri adiaŭis nian karan patron en la sama tago, sed ĉar ŝajnis al mi nehumane lasi homon tiel oldan kun tiel etaj rimedoj, mi igis lin preni du mil el miaj tri mil dukatoj, tial, ke al mi sufiĉus la cetero por miaj bezonoj de soldato. Miaj du fratoj sekvis mian ekzemplon, kaj ĉiu donis al li mil dukatojn, tiel, ke fine li havis mone kvar mil dukatojn, kaj krome tri mil pliajn, t.e. la valoro de sia parto de la bieno, parto, kiun li ne volis vendi kaj retenis en ties formo de kampoj. Nu, kiel mi diris, ni adiaŭis lin kaj la onklon kun ĉiuflanke granda emocio kaj larmoj, kaj ili insistis, ke ni devus sendi al ili novaĵojn pri ni, bonajn aŭ ne bonajn, en ĉiu oportuna momento. Ni promesis tion fari, li brakumis nin, donis al ni sian benon, kaj unu ekiris la vojon al Salamanca, alia al Sevilla, kaj mi al Alicante, kie, kiel oni jam informis min, troviĝis ĝenova ŝipo ŝarĝata per lano kaj navigonta al Ĝenovo.

»Antaŭ dudek du jaroj mi forlasis la patran domon kaj en tiel longa tempo mi ricevis nenian sciigon de la flanko de mia patro aŭ de miaj fratoj, kvankam mi skribis al ili kelke da leteroj. Kion mi travivis en tiuj jaroj, mi resume rakontos al vi: Mi enŝipiĝis ĉe Alicante, bone alvenis al Ĝenovo kaj plu vojaĝis al Milano, kie mi aĉetis la armojn kaj parton de la uniformo; de tie mi decidis iri soldatiĝi en Piemonto. Sed sur la vojo al Aleksandrio de la Palla mi eksciis, ke la granda duko de Alba sin direktas al Flandrujo. Mi ŝanĝis do mian projekton, aliĝis al li, servis lin en ties kampanjoj, ĉeestis la morton de la grafoj Egmont kaj Horn, kaj oni nomis min subleŭtenanto en la trupoj komanditaj de Diego de Urbina, fama kapitano de Guadalajara; kelkan tempon post mia alveno al Flandrujo cirkulis la novaĵo, ke lia sankteco la papo Pio la 5-a, laŭde memorinda, sin aliancis kun Venecio kaj Hispanujo kontraŭ la komuna malamiko, la turko, kies floto

iom pli frue konkeris la faman insulon Cipro, ĝis tiam regata de la venecianoj: perdo dolora kaj bedaŭrinda.

»Oni sciis kun certeco, ke ĉi aliancon komandus Lia Serenega Alteco don Juan de Austria, natura frato^[164] de nia bona reĝo don Filipo, kaj, laŭ la famo, estis farataj enormaj preparadoj militaj. Ĉio ĉi ekscitis min kaj vekis en mi la ardan deziron partopreni en la projektita kampanjo: kaj kvankam mi havis la suspekton, kaj preskaŭ la certecon, ke en la unua okazo mi ricevus la rangon de kapitano, tamen mi preferis ĉion forlasi kaj iri al Italio, kion mi faris; kaj mi estis bonsorta, ĉar sinjoro don Juan de Austria ĵus alvenis tiam al Ĝenovo survoje al Napolo por kuniĝi kun la venecia floto, kvankam la renkonto okazis poste ĉe Mesino. Tiel do, mi troviĝis en la plej glora batalo^[165] kiel infanteria kapitano, al kies honora rango min levis la hazardo pli ol miaj meritoj. En tiu tago, feliĉa por la kristanaro, ĉar la tuta mondo konvinkiĝis, ke ĝi eraris kredante la turkojn nevenkeblaj sur la maro, en tiu tago, mi ripetas, kiam la insolenta orgojlo otomana suferis baton pereigan, nur mi, inter tiom da feliĉuloj tie troviĝantaj (ĉar eĉ pli da feliĉo havis la kristanoj mortintaj en la batalo, ol la vivaj kaj triumfaj), nur mi estis senfortuna: efektive, anstataŭ la marmilita krono, kian mi povus esperi en la epoko de la antikva Romo, mi vidis min, en la nokto sekvanta la faman tagon, kun ĉenoj sur la piedoj kaj kun katenoj sur la manoj.

»Jen kiel okazis la afero. Uchalí, la reĝo de Alĝerio, kuraĝa kaj sukcesa pirato, atakis kaj okupis la Maltan flag-ŝipon, kies ĉiuj batalantoj perdis la vivon, krom tri kavaliroj grave vunditaj. Tiam la flag-ŝipo de Juan de Andrea, kie mi troviĝis, rapidis helpi la okupitan, kaj, farante mian devon en tiaj cirkonstancoj, mi ensaltis en la malamikan galeron, sed ĉi lasta, en la sama momento, sukcesis apartiĝi de nia sturmanta ŝipo, tiel, ke miaj soldatoj ne povis ensalti post min; mi vidis min sola inter la malamikoj kaj nekapabla

rezisti, ĉar ili estis tro multaj; resume, mi devis kapitulaci plena de vundoj. Nu, kiel vi, sinjoroj, certe scias, Uchalí eskapis kun sia tuta eskadro, kaj mi fariĝis do la sola trista viro inter tiom da ĝojaj kaj la sola kaptito inter tiom da liberaj, ĉar tiun tagon 25.000 kristanaj rem-sklavoj de la turka floto retrovis la sopiratan liberecon.

»Oni prenis min al Konstantinopolo, kie la Granda Turko Selim nomis mian mastron Generalo de la Maro pro tio, ke li plenumis sian devon en la batalo kaj prezentis, kiel pruvon de sia kuraĝo, la standardon de la Kavaliroj de Malto. La sekvantan jaron, 1572, mi troviĝis ĉe Navarino remante en la admirala flag-ŝipo, kaj vidis, ke tiam perdiĝis la okazo bloki la havenon kaj kapti la tutan floton turkan, ĉar ties marsoldatoj kaj janiĉaroj certis, ke oni atakos ilin en la haveno mem, kaj ili havis ĉemane la vestaĉojn kaj *passanaques*, t.e. la ŝuojn, por tuj eskapi surtere sen atendi batali: tian teruron inspiris al ili nia floto. Sed la ĉielo decidis alie, ne pro kulpo aŭ neglekto de la generalo don Juan de Austria, sed pro la pekoj de la kristanaro, kaj pro tio, ke Dio permesas kaj volas, ke ia skurĝo nin punu konstante. Efektive, Uchalí refuĝis en Modon, insulo proksima al Navarino, elŝipigis la trupojn, fortikigis la buŝon de la haveno, kaj tie restis kviete ĝis sinjoro don Juan retiris sin. En ĉi ekspedicio oni kaptis la turkan galeron *La Presa*, kies kapitano estis filo de la fama pirato Barbaroso. Ĝin kaptis *La Lupino*, flag-ŝipo de Napolo, komandita de don Álvaro de Bazán, markizo de Santa Cruz, fulmo de la milito, patro al siaj soldatoj, bonŝanca kaj neniam venkita kapitano.

»Mi ne povas ne rakonti tion okazintan ĉe la kapto de *La Presa*. La filo de Barbaroso estis tiel kruela kaj tiel rigore traktis siajn sklavojn, ke ili, vidante ke la galero *La Lupino* alsturmas, lasis la remilojn, alsaltis la kapitanon, kiu kriadis ilin remi pli energie, kaj puŝetante lin de benko al benko kaj de la poŭpo al la pruo, ili tiel mordadis lin, ke apenaŭ li

preterpasis la ĉefan maston, lia animo jam pasis en la inferon: tiel kruele li traktis ilin, kaj tiel grandan abomenon ili sentis al li.

»Ni revenis al Konstantinopolo, kaj la sekvantan jaron, 1573, trafis nin la novaĵo ke don Juan konkeris Tunizion disde la turkoj kaj transdonis la regnon al Muley Hamet, kio lasta vanigis la esperon de Muley Hamida, la maŭro plej kruela kaj kuraĝa de la mondo, residi en la trono tunizia. La Granda Turko tre bedaŭris ĉi perdon kaj kun la ruzo propra al lia raso faris la pacon kun la venecianoj, kiuj deziris ĝin eĉ pli ol li. La sekvantan jaron, 1574, li sturmis La-Goletan, kaj la fortreson, kiun don Juan lasis duonkonstruita apud Tunizo. Dum ĉio ĉi okazis, mi sidadis ĉe la remilo, sen ia espero trovi la liberon, almenaŭ per elaĉeto, ĉar mi faris al mi la decidon ne skribi al mia patro pri la misfortuno min trafinta.

»Fine La-Goleta perdiĝis, kaj ankaŭ la fortreso; ilin sieĝis 75.000 turkaj soldatoj kaj pli ol 400.000 maŭroj kaj araboj el la tuta Afriko, provizitaj per tiom da municio kaj materialo kaj akompanataj de tiom da sapeistoj, ke ili povintus, nur ĵetante plenmanojn da tero, kovri La-Goletan kaj la fortreson. La-Goleta, ĝis tiam konsiderata nekonkerebla, falis unua, ne pro ia kulpo de la garnizono, kies soldatoj sin defendis kiom ili sciis kaj povis, sed pro tio, ke, kiel la sperto instruis al la turkoj, oni tre facile povis konstrui sur la sablo de la dezerto altajn parapetojn, ĉar, kvankam la akvo ordinare kuŝis je du spanoj sub la surfaco, la turkoj ne trovis ĝin eĉ en la profundo de du klaftoj; sekve, ili konstruis per sakoj da sablo parapeton tiel altan, ke ĝi superregis la murojn de la fortreso, kaj la sieĝitoj, alpaŝitaj de supre, ne povis prezenti efikan reziston.

»Oni ĝenerale opiniis, ke niaj soldatoj ne devintus sin enfermi en La-Goleta, sed oponi sur la aperta kamparo al la subordiĝo de la turkoj. Sed la homoj tiel opiniantaj, parolas

tre fore de la loko de la eventoj kaj kun eta kono de la faktoj; se konsideri ke en La-Goleta kaj en la fortreso apenaŭ troviĝis 7.000 soldatoj entute, ĉu tiel eta trupo, eĉ se ĝi konsistis nur el herooj, povus simultane batali ekstere kaj deinterne defendi la fortreson kontraŭ la multenombra malamiko? Ĉu sen ricevi helpon oni povas ne perdi fortreson, precipe kiam ĝin sieĝas multaj kaj obstinaj soldatoj kaj en sia propra lando? Tamen mi pensis, kiel multaj aliaj homoj, ke la ĉielo konsentis specialan gracon kaj favoron al Hispanujo, permesante la detruon de tiu puto da abomenindaĵoj, de tiu nesatigebla faŭko, kiu englutis senprofite la kolosajn sumojn tie konsumitajn nur por konservi ĝin honore al la memoro de ĝia konkerinto, la nevenkebla Karolo la 5-a; kvazaŭ por igi lian nomon eterna, kia ĝi estas kaj estos, necesus tiu amaso da ŝtonoj!

»Ankaŭ la fortreso falis; sed la turkoj konkeris ĝin nur futon post futo, ĉar la garnizonanoj batalis tiel senlace kaj heroe, ke ili mortigis 25.000 malamikojn dum ties 22 ĝeneralaj sturmoj. Nur 300 kristanoj supervivis, kaj ili plenis de vundoj, kiam la turkoj ilin kaptis, kio klare kaj evidente pruvas la grandon de ilia kuraĝo kaj sinofero. Unu eta fortikaĵo aŭ turo staranta en la mezo de la lago, komandita de don Juan Zanoguera, valencia kavaliro kaj fama soldato, kapitulacis sub antaŭakorditaj kondiĉoj. La turkoj kaptis la generalon de La-Goleta, don Pedro Puertocarrero, kvankam li faris ĉion eblan en la defendo de la loko; ĝia perdo tiel doloris al li en la koro, ke li mortis de aflikto survoje al Konstantinopolo, kien li estis kondukata kiel kaptito. Ili kaptis ankaŭ la generalon de la fortreso, Gabrio Cervellón, milana kavaliro, fama inĝeniero kaj tre kuraĝa militisto. En La-Goleta kaj en la fortreso mortis multe da gravuloj, inter ili Pagán de Oria, kavaliro de la ordeno de Sankta Johano, grand-anima homo, se konsideri kiel sindone li traktis sian fraton, la faman Juan Andrea de Oria; kaj lia morto des pli bedaŭrindas, ĉar, vidante la fortreson perdita, li fidis je

kelkaj araboj; ili promesis al li, lin konduki en araba kostumo ĝis Tabarca, ia eta haveno de ĝenovanoj establita tie, ĉe la marbordo, por fiŝi koralojn. Nu, la samaj araboj dehakis al li la kapon kaj ĝin alportis al la turka generalo, sed li traktis ilin laŭ la spirito de la hispana proverbo, kiu diras, ke, «kvankam la perfido plaĉas, la perfiduloj abomenindas»; efektive, laŭ la famo, la generalo ordonis pendumi la portintojn de la kapo, ĉar ili ne prezentis la viron viva.

»Inter la kristanoj kaptitaj en la fortreso troviĝis don Pedro de Aguilar, naskita ie en Andaluzio, subleŭtenanto en la garnizono, militisto de granda renomo kaj rara inteligento kaj kun speciala kapablo por la tiel nomata poezio. Mi tion diras, ĉar la sorto kondukis lin al mia galero kaj al mia benko, kiel sklavon de mia propra mastro; kaj antaŭ ol nia ŝipo ekiris de la haveno, ĉi kavaliro komponis du sonetojn de epitafa karaktero, unu dediĉita al La-Goleta, kaj la alia al la fortreso. Mi dezirus ilin deklami, ĉar mi scias ilin parkere kaj kredas, ke, pli ol enuon, ili donus al vi plezuron.

En la momento, kiam la kaptito diris la nomon de don Pedro de Aguilar, don Fernando rigardis al siaj kamaradoj kaj la tri ridetis; poste, ĉe la mencio de la sonetoj, diris unu el la kavaliroj:

—Antaŭ ol daŭrigi, sinjoro, bonvolu diri al mi, kio okazis al de vi aludita don Pedro de Aguilar.

—Mi scias nur —respondis la kaptito—, ke post du jaroj da restado en Konstantinopolo li fuĝis, alivestita kiel albano, kun greka spiono. Mi ne scias, ĉu li venis en liberon, ĉar, kvankam unu jaron poste mi denove renkontis la grekon en Konstantinopolo, mi ne povis demandi al li, ĉu la fuĝo sukcesis.

—Sukcesis —respondis la kavaliro—. Tiu don Pedro estas mia frato, kaj loĝas nun en nia vilaĝo, sana, riĉa, edzo kaj kun tri filoj.

—Dankon al Dio pro tiel multaj favoroj al li! —diris la kaptito—. Vere, mi kredas, ke ne ekzistas sur la tero pli supera ĝojo ol la retrovo de la perdita libero.

—Aldone —respondis la kavaliro—, ankaŭ mi scias la sonetojn de mia frato.

—Bonvolu do deklami ilin, sinjoro —petis la kaptito—, ĉar certe vi tion faras pli bone ol mi.

—Tre volonte —respondis la kavaliro—. La soneto pri La-Goleta tekstas jene:

[163] Aludo al la fama konkerinto antikva, kiel prototipo de homo riĉega.

[164] Eksteredzeca, bastarda.

[165] La interŝipa batalo de Lepanto, okazinta la 7-an de oktobro de 1571, kiam la kristana alianco venkis la turkan floton. Ĉi tiu ĉapitro rakontas historiajn faktojn kaj parte estas aŭtobiografia; kiel sciante, Cervantes batalis ĉe Lepanto kaj ricevis kripligan vundon sur la mano. Poste, ekde 1575, la turkoj tenis lin kvin jarojn en kaptiteco.

Ĉapitro 40

Daŭrigo de la historio de la kaptito

Soneto

Feliĉas vi, falinte pur-animaj,
ĉar vin, liberajn de la viv-mizero
la faroj viaj levis de ĉi tero
al la ĉielaj altoj plej sublimaj.

Kun ardo, spito kaj fervor' sentimaj
batalis vi puŝate de kolero,
ĝis ĉies sango ŝprucis en libero,
kaj maro, sablo ŝajnis ruĝo-ŝlimaj.

Ne la kuraĝo, sed la energio
unue el la lacaj brakoj iris:
vi mortis, sed, venkite, venkis ronde

ĉar via tera, trista tragedio
el fer' kaj ŝtonoj jam por vi akiris
la gracon enĉiele, famon monde.

—Temas pri la samaj versoj, kiujn mi scias —asertis la kaptito.

—Kaj jen la fortresa soneto, se mia memoro ne lamas —diris la kavaliro.

Soneto

El ĉi arida ter' el ĉi ruino
kuŝanta dise pro batalaj fatoj,

l' animoj sanktaj de tri mil soldatoj
supriris, vivaj, al la dia sino.

Fort-brake bataladis kun obstino,
sed, jam malmultaj, sangaj sub la batoj
de akre tranĉaj glavoj, l' atakatoj
transiris alimonden en la fino.

Sur tia tero kontinue restis
demonoj mil, perversaj kaj teruraj,
en la jarcentoj nunaj kaj paseaj.

Neniam, tamen, ĉi-dezerte estis
animoj gracoplenaj tiel puraj
nek viroj pli kuraĝe dev-obeaj.

La sonetojn oni laŭdis, kaj la kaptito, ĝoja pro la bonaj
novaĵoj diritaj pri sia kamarado, daŭrigis la rakonton jene:

—Nu, La-Goleta kaj la fortreso kapitulacis, kaj la turkoj
ordonis la eldetruon de La-Goleta (rilate al la fortreso, ĝi tiel
disfalas, ke nenio detruinda restis); por ŝpari tempon kaj
laboron oni minis La-Goletan en tri lokoj, sed la minoj ne
povis disfrakasi tion, kio ŝajnis ebla, t.e. la oldan remparon,
dum la ankoraŭ starantaj partoj de la novaj muroj konstruitaj
de El Fratín facile renversiĝis.

»Fine, la floto revenis al Konstantinopolo venke kaj triumfe,
kaj plurajn monatojn poste mortis mia mastro Uchalí, nomita
Uchalí Fartax, kio en la turka lingvo signifas «la skabia
renegato», kaj efektive, li estis tia; la turkoj havas la
kutimon alnomi iun laŭ ties mankoj aŭ virtoj, ĉar ĉe ili
ekzistas nur kvar familiaj nomoj de otomana deveno, kaj la
plimulto el la turkoj ricevas do, kiel dirite, alnomon aludan al
la mankoj de la korpo aŭ al la virtoj de la animo. Dum dek
kvar jaroj ĉi skabia ulo remadis kiel sklavo de la Granda

Sinjoro; kaj iam, jam pli ol 34-jara, remante, li ricevis fortan survangan de iu turko kaj, furioza, fariĝis renegato por povi venĝi sin. Tiom li fine distingiĝis pro sia kuraĝo, ke, sen helpi sin per hontigaj metodoj kaj rimedoj uzataj de la pliparto de la favoritoj de la Granda Turko, li gajnis al si la tronon de Alĝerio kaj poste la generalecon de la maro (la trian postenon, laŭ gravo, de ilia regno). Li naskiĝis en Kalabrio, havis bonan karakteron moralan kaj tre humane traktis siajn kaptitojn. Lastatempe li posedis tri mil da ili, kaj post lia morto oni ilin distribuis inter la Granda Sinjoro (li estas konsiderata kiel filo de ĉiu mortinto, sekve li ricevas sian parton de la heredo) kaj liaj renegatoj; min oni transdonis al venecia renegato, iama ŝip-knabo, kiun Uchalí kaptis surmare kaj poste tiel amis, ke li faris lin unu el siaj plej regalataj garzonoj.^[166] La veneciano, plej kruela renegato iam vivinta, havis la nomon Ayan Aga, akiris multe da riĉoj kaj la kronon de Alĝerio. Mi do iris kun li de Konstantinopolo al Alĝerio, kontenta proksimiĝi al Hispanujo, ne pro tio, ke mi havus la ideon skribi al iu pri mia misfortuno,^[167] sed ĉar mi pensis, ke la sorto eble montriĝus pli favora ol en Konstantinopolo, kie mi provis milmaniere fuĝi sen ia sukceso. Mi pensis, ke en Alĝerio mi povus iel plenumi mian grandan deziron, ĉar mi tute ne perdis la esperon vidi min denove libera; efektive, kiam miaj pensoj, projektoj kaj faroj ne donis la atenditan rezultaton, mi ne perdis la kuraĝon, sed tuj forĝis al mi alian planon, eĉ senbazan kaj feblan, kapablan revivigi en mi la esperon. Tiel mi pasigis la tempon en la prizono aŭ bagno, kie la turkoj enfermas la kristanajn kaptitojn, kiuj apartenas al la reĝo, al kelkaj privatuloj, kaj al *magacén* aŭ magistrato; la magistrataj kaptitoj estis okupataj ĉe publikaj laboroj kaj aliaj taskoj kaj tre malfacile retrovas la liberon, ĉar ili apartenas al la komunumo, ne al privata mastro, kaj sekve ne scias kun kiu trakti sian elaĉeton, se ili havas monon por tio. Kiel dirite, kelkaj privatuloj de la urbo enfermas en la bagno siajn sklavojn,

ĉefe la redoneblajn kontraŭ pago, kaj tie oni tenas ilin senokupaj kaj sekuraj ĝis la alveno de la elaĉeta mono. Ankaŭ la elaĉetataj sklavoĵoj de la reĝo ne iras labori kun la aliaj de la grupo, se oni ne prokrastas la sendon de la postulata sumo; ĉi-okaze, por ke la kaptitoj petu pli urĝe la liberigan monon, oni devigas ilin labori kaj kolekti brullignon, kio lasta ne estas facila tasko.

»Ankaŭ min oni listis kiel redoneblan, ĉar, kvankam mi asertis, ke mi ne posedas nek kapitalon nek alian propraĵon, oni ne atentis mian diron, sciante, ke mi havas la rangon de kapitano. Oni surmetis al mi ĉenon, pli kiel distingilon de elaĉetebulo, ol kiel sekurigan rimedon, kaj en tia stato mi vivis en la bagno kun aliaj multaj kavaliroj kaj moŝtuloj konsiderataj kaj traktataj kiel elaĉetotoj. Kaj, kvankam ofte (fakte, preskaŭ ĉiam) malsataj kaj duonnudaj, ni plej afliktiĝis, kiam ni ĉiumomente vidis kaj aŭdis la neniam antaŭe vidatan kaj aŭdatan kruelon, kiun mia mastro uzis kontraŭ la kristanoj. Ĉiutage li igis pendumi unu, palisumi alian, detranĉi la orelojn al cetera, kaj ĉion ĉi li faris je la plej eta preteksto (aŭ tute sen ia preteksto), tiele, ke eĉ la turkoj mem konfesis, ke li kruelas pro la nura plezuro krueli, kaj ke lia naturo lin puŝas krimi kontraŭ la tuta homa raso. Nur unu hispana soldato, iu Saavedra,^[168] ne ricevis de li mistrakton, kvankam en sia klopodado retrovi la liberon, li plenumis tiajn aferojn, ke ili restos dum multaj jaroj en la menso de la turka gento; tamen, lia mastro neniam vergis aŭ igis vergi lin, nek diris al li eĉ unu solan krudan vorton; dume ni timis, ke eĉ pro la plej eta el liaj faroj oni fine palisumos lin, kaj li mem timis la samon pli ol unu fojon. Se mi disponus sufiĉan tempon, mi rakontus al vi iomon el la aventuroj de ĉi soldato, pli distraj kaj mirigaj ol mia propra historio.

»Nu, al la korto de nia bagno rigardis la fenestroj de la domo de riĉa kaj grava maŭro; la fenestroj, kiel ordinare en la maŭraj domoj, similis al truoj, kaj krome ilin kovris tre densaj

kaj dikaj ĵaluzioj. Okazis do, ke iam mi troviĝis kun tri kompanoj en la teraso de la bagno, kaj, por pasigi la tempon, ni, en niaj ĉenoj, provis fari saltojn. Ni estis solaj, ĉar la ceteraj kristanoj jam eliris labori; tute hazarde mi levis la rigardon kaj rimarkis, ke tra la ĵaluzioj moviĝas unu kano kun poŝtuko alligita al sia ekstremo, kvazaŭ signante, ke ni proksimiĝu por preni ĝin. Ni donis tiun interpreton al la movoj, kaj unu el miaj kompanoj iris loki sin sub la kano por vidi, ĉu oni ĝin delasos, aŭ kio alia okazos; sed apenaŭ li alvenis, la kano leviĝis kaj moviĝis ambaŭflanken, kvazaŭ dirante, «ne». La kristano revenis al nia flanko, kaj la kano denove moviĝis kiel ĉe la komenco. Tiam, alia kompano proksimiĝis, sed okazis al li same kiel al la unua. Fine, la tria aliris kaj renkontis la saman akcepton kiel la unua kaj la dua. Vidante tion, ankaŭ mi volis provi mian ŝancon, kaj, kiam mi lokis min sub la kano, oni lasis ĝin fali en la bagon, antaŭ miaj piedoj. Mi rapidis disligi la poŝtukon, en kies interno kuŝis dek *cianís*, ormoneroj de basa titro uzataj de la maŭroj, kaj ĉiu valoranta po dek el niaj realoj. Nenecese diri, ke mi tre ĝojis ĉe la trovo; sed mi perpleksis tiel multe kiel mi kontentis, ĉar mi ne povis klarigi al mi la kialon de tia donaco, speciale destinata al mi, se konsideri, ke, en klara signo de prefero, la kanon oni lasis fali nur antaŭ mi. Mi prenis do bonvenan monon, rompis la kanon, revenis al la teraso, rigardis al la ĵaluzio kaj vidis, ke tre blanka mano aperas kaj rapide apertas kaj fermas la fenestron. Ĉe tio mi pensis aŭ imagis, ke virino loĝanta en tiu domo faris al ni la donacon, kaj por montri nian dankemon, riverencis laŭ la maŭra stilo, klinante la kapon kaj la korpon, kaj krucante la brakojn su la brusto. Iom poste oni elmontris el la sama fenestro krucon el kanoj kaj tuj retiris ĝin. El tio ni konkludis, ke en la domo troviĝas kristana sklavino, kaj ke ŝi faris al ni la donacon; sed la blanka haŭto de ŝia mano kaj la braceletoj ĉe ŝia pojno kontraŭis nian konjekton. Sekve ni imagis, ke certe temas pri renegata kristanino, laŭleĝa edzino de ŝia mastro, ĉar ofte okazas, ke la maŭroj volonte

edziĝas al tiaj kristaninoj kaj ilin preferas al la virinoj de sia propra lando; tamen, niaj konjektoj tre distis de la vero.

»De tiam, nia sola okupo konsistis en tio, rigardi la fenestron, kiel nordon kie jam montriĝis nia bonsorta stelo en la formo de kano. Sed pasis 15 plenaj tagoj, sen ke ni vidus la kanon, la manon aŭ alian signalon. Kaj, kvankam en la dirita tempo ni ĉiamaniere klopodis ekscii, kiu loĝas en la domo, kaj ĉu troviĝas en ĝi renegata kristanino, ni nur informiĝis, ke tie loĝas riĉa maŭro nomata Agi Morato, kiu iam okupis la postenon de gubernatoro de Pata, unu el la plej gravaj oficoj maŭraj. Sed foje, kiam ni jam preskaŭ ne pensis, ke ni povus ricevi alian pluvon de *cianís*, ni vidis la kanon subite aperi kun nodita poŝtuko pli ŝvela ol la alia. Tio okazis, kiel en la unua fojo, kiam la bagno troviĝis dezerta. Ni faris la kutiman provon, nome, ĉiu el miaj tri kompanoj iris antaŭ ol mi, sed nur al mi oni destinis la kanon, ĉar, kiam mi alvenis, oni lasis ĝin fali. Mi disligis la nodon kaj trovis 40 hispanajn eskudojn el oro kaj leteron en la araba, ĉe kies fino vidiĝis granda kruco plume farita. Mi kisis la krucon, prenis la eskudojn, revenis al la teraso, kie ni riverencis, aperis denove la mano, mi promesis per signoj legi la leteron, kaj la fenestro fermiĝis.

»Ni sentis ĝojon kaj surprizon ĉe la okazaĵo; kaj tial, ke eĉ ne unu el ni komprenis la araban, nia deziro koni la enhavon de la bileto estis tre granda, sed eĉ pli granda fariĝis al ni la malfacilo renkonti personon, kiu scipovus ĝin legi. Fine mi decidis turni min al renegato el Murcia, deklarinta sin bona amiko mia kaj interŝanĝinta kun mi la solenan promeson sin devigi gardi ajnan sekreton, kiun mi konfidus al li; ja, la renegatoj kutimas, se ili intencas reveni al kristanaj landoj, porti kun si atestojn de precipaj kaptitoj, kiuj laŭpove deklaras per tiaj dokumentoj, ke la koncerna renegato estas honesta homo, ĉiam bona al la kristanoj kaj preta eskapi ĉe la unua oportuna momento. Kelkaj renegatoj havigas al si

bonintence, ĉi paperojn; aliaj ilin deziras por uzo en okazo de bezono, nome, se ili venas predi al kristanaj landoj kaj hazarde perdiĝas aŭ estas kaptitaj; tiam, ili montras la atestojn por pruvi, ke ili venis kun la intenco loĝi denove inter la kristanoj, kaj aldonas ke nur tiucele ili akompanis la turkojn en ties rab-atakoj. Tiel ili evitas la unuan danĝeron kaj repaciĝas kun la Eklezio sen ricevi punon; kaj kiam prezentiĝas okazo oportuna, ili revenas al Berberio, kie ili vivas kiel antaŭe. Tamen, aliaj uzas dece ĉi paperojn kaj havigas ilin al si kun la honesta intenco resti en kristana lando; nu, unu el ĉi lastaj renegatoj estis mia amiko, kaj li ricevis de ĉiuj niaj kamaradoj atestojn, kiuj pleje rekomendis lin, tiom, ke se la maŭroj estus trovintaj sur li la dokumentojn, ili bruligus lin viva. Mi sciis, ke li konas la araban, ne nur parole, sed ankaŭ skribe; tamen, antaŭ ol plene riveli al li la aferon, mi diris al li, ke mi hazarde trovis la bileton en truo de mia ĉelo, kaj ke li bonvolu legi ĝin al mi. Li disfaldis kaj longe rigardis la paperon, kaj komencis deĉifri murmurante tradente. Mi demandis, ĉu li komprenas la skribaĵon, li respondis, ke tute senpene, kaj, ke se ni volas koni la tradukon vorton post vorto, ni devas havigi al li plumon kaj inkon por faciligi al li la taskon. Ni tuj donis al li kion li petis, li tradukis iom post iom kaj diris ĉe la fino:

»—Jen, hispane, la tuta araba teksto de ĉi letero; sed ne forgesu, ke, kie legiĝas Lela Marien, oni komprenu Nia Sinjorino la Virgino Maria.

»Ni legis la jenon:

Kiam mi estis infano, mia patro havis sklavinon, kaj ŝi instruis al mi en mia propra lingvo la kristanajn preĝojn kaj tre parolis pri Lela Marien. Ĉi kristanino mortis, kaj mi scias, ke ŝi iris ne en la fajron de la infero, sed en la sinon de Allah, ĉar ŝi aperis antaŭ mi du fojojn kaj diris al mi, ke mi iru al kristana lando vidi Lela Marien, kiu

min tre amas. Mi ne scias, kiel iri tien. Tra ĉi fenestro mi jam vidis multe da kristanoj, sed nur vi havas aspekton kavaliran. Mi estas tre bela knabino kaj povas preni kun mi multan monon. Vidu, ĉu vi povos trovi la manieron foriri kun mi; mi estos via edzino, se vi volas; se ne, ne gravas, ĉar Lela Marien havigos edzon al mi. Mi mem skribas ĉi leteron: zorge pripensu, antaŭ ol montri ĝin por lego al aliaj. Ne fidu la maŭrojn, ili estas insidemaj. Tio kaŭzas al mi multe da zorgoj. Prefere rivelu la aferon al neniuj, ĉar, se mia patro sciis pri kio temas, li tuj ĵetus min en puton kaj kovrus min per ŝtonoj. Al la kano mi almetos fadenon; ligu al ĝi la respondon, kaj se vi ne trovos homon kapablan skribi ĝin en la araban, parolu al mi per signoj, kaj Lela Marien igos min kompreni. Ŝi kaj Allah vin protektu, kaj same ĉi kruco, kiun mi ofte kisas, kiel la sklavino konsilis al mi.

»Imagu, sinjoroj, ĉu ni ne havis motivon ĝoji kaj miri pro la enhavo de la letero. Efektive, nia emocio estis tiel profunda, ke la renegato komprenis, ke ne hazarde ni trovis la paperon, kaj ke oni intence sendis ĝin al unu el ni. Li diris do, ke, se li ĝuste suspektis, ni devus konfidi lin kaj konfesi al li la veron, ĉar li volonte riskus sian vivon por helpi nin retrovi la liberon. Kaj tion dirante li eltiris de sub sia ĉemizo metalan krucifikson, kaj kun multaj larmoj li ĵuris je la Dio krucumita, ke li, kvankam pekema kaj malica, firme kaj sincere kredas je Li kaj lojale gardus la sekreton, kiun ni rivelus al li; li aldonis, ke li imagis, kaj preskaŭ divenis, ke helpe de la virino skribinta la leteron, li, kaj ni ĉiuj, atingus la liberon, kaj krome li plenumus kion li arde deziris, la revenon en nian Sanktan Patrion la Eklezion, de kies sino li disiĝis kiel putra membro pro sia nescio kaj pekemo. La renegato parolis kun tiom da larmoj kaj elmontroj de pento, ke ni ĉiuj unuanime konsentis diri al li la veron, do rakontis al li la tutan aferon, kaŝante nenion. Ni montris al li la fenestron, kie la kano aperis, li atente ekzamenis per la

rigardo la domon kaj promesis fari ĉion eblan por informiĝi kiu loĝas tie. Ni opiniis ankaŭ, ke estus bone respondi la bileton de la maŭrino, kaj, ĉar troviĝis ĉe ni la persono povanta fari tion, la renegato, li tuj skribis laŭ mia diktado. Mi povas ĝuste memori ĉiun vorton, ĉar mi forgesis eĉ ne unu solan detalon de ĉi aventuro, kaj nenion forgesos dum mi vivos. Jen do la respondo al la maŭrino:

La vera Allah vin gardu, kara sinjorino, kaj same la benata Marien, kiu estas la vera patrino de Dio kaj inspiris vin iri al kristana lando, ĉar ŝi vin amas. Preĝu al ŝi, ke ŝi bonvolu riveli al vi, kiamaniere vi povos obei ŝian instrukcion; ŝi estas tiel bona, ke certe ŝi komplezos vin. De mia flanko, kaj de la flanko de la kristanaj kompanoj miaj, mi promesas fari por vi ĉion eblan, eĉ morti, se bezone. Nepre skribu, sciigante al mi kion vi intencas. Mi ĉiam respondos, ĉar la granda Allah sendis al ni kristanan sklavon, kiu scias bone paroli kaj skribi vian lingvon, kiel ĉi papero montras. Vi povas do, sen ia timo, komuniki al ni ion ajn laŭvole. Rilate al via propono edziniĝi al mi, kiam vi atingos kristanan landon, mi promesas al vi, kiel bona kristano, ke mi prenos vin kiel edzinon; kaj sciu, ke la kristanoj plenumas siajn promesojn pli bone ol la maŭroj. Allah kaj lia patrino Marien protektu vin, kara sinjorino.

»Post ol oni skribis kaj fermis ĉi leteron, ni atendis du tagojn, ĝis la bagno vidiĝis dezerta; kiel kutime mi iris al la sama loko de la teraso por observi, ĉu la kano aperos; baldaŭ ĝi montriĝis, kaj vidinte ĝin, kvankam mi ne povis distingi ĝian tenanton, mi tuj svingis la paperon, komprenigante, ke ŝi almetu la fadenon; sed mi rimarkis tiam, ke jam la fadeno pendas de la kano, do mi alligis la paperon, la kano leviĝis, kaj iom poste aperis denove nia stelo kun la blanka paco-flago: la nodita poŝtuko. Oni lasis la kanon fali, mi ĝin prenis kaj trovis en la tuko pli ol 50 eskudojn en plej diversaj

moneroj oraj kaj arĝentaj, kiuj 50 fojojn multiplikis nian ĝojon kaj confirmis nian esperon atingi la liberon. Tiun saman nokton revenis nia renegato kaj diris al ni, ke li konstatis, ke en la domo loĝas la maŭro, pri kiu oni jam parolis al ni; ke li nomiĝas Agi Morato, ke li estas riĉega kaj havas nur unu filinon, kiu heredos lian tutan posedon; ke laŭ ĝenerala opinio de la tuta urbo, ŝi estas la plej bela virino de Berberio; ke multaj vic-reĝoj tieaj petis ŝian manon, kaj ke ŝi neniam volis edziniĝi. La renegato informiĝis ankaŭ pri tio, ke iam ŝi havis kristanan sklavinon, kiu jam mortis. Liaj informoj do konformis al la enhavo de ŝia bileto.

»Poste ni konsiliĝis kun la renegato pri la maniero forkonduki la maŭrinon kaj akompani ŝin al kristana lando: fine ni interkonsentis atendi la duan leteron de Zoraida (tiel ŝi nomiĝis, kvankam nun ŝi deziras havi la nomon María), ĉar ni bone komprenis, ke nur de ŝi dependis la solvo de niaj malfaciloj. Tiel interkonsentinte, la renegato diris al ni, ke ni zorgu pri nenio, ĉar li liberigus nin aŭ perdus la vivon en la entrepreno.

»Dum kvar tagojn troviĝis homoj en la bagno, kio signifis, ke kvar tagojn ne aperis la kano; ĉe la fino de la dirita tempo, kiam la bagno denove vidiĝis dezerta, la kano montriĝis kun poŝtuko tiel graveda, ke ĝi aŭguris feliĉan akuŝon. La kano, kun sia ŝarĝo, kliniĝis al mi; mi trovis en la tuko alian leteron kaj cent eskudojn el oro, sen alispecaj moneroj. La renegato estis kun ni, kaj, reveninte al nia ĉelo, ni donis al li la leteron por lego. Li tradukis jene:

Mi ne scias, kara sinjoro, kiel aranĝi nian vojaĝon al Hispanio. Ĉi-rilate Lela Marien nenion diris al mi, kvankam mi ŝin demandis. Mi povas nur transdoni al vi tra ĉi fenestro multege da oraj moneroj; per ili elaĉetu vin kaj viajn amikojn; unu el vi iru al kristana lando akiri barkon tie kaj revenu forkonduki la aliajn. Mi troviĝos en

la bieno de mia patro, ĉe la pordego de Babazon, apud la marbordo, kie mi restos la tutan someron kun miaj patro kaj servistoj. En la nokto vi facile povos forkonduki min de tie al la barko. Memoru, ke vi devas edziĝi al mi, alie mi petos de Marien, ke ŝi vin punu. Se vi ne havas fidon al la personoj, kiuj povus iri akiri la barkon, elaĉetu vin kaj mem iru; mi scias, ke vi certe revenos, ĉar vi estas kavaliro kaj kristano. Zorgu informiĝi kie situas nia bieno. Kiam vi denove venos al la teraso, mi komprenos, ke la bagno dezertas, kaj mi liveros al vi multe da mono. Allah vin gardu, kara sinjoro.

»Tiel tekstis la dua letero. Leginte ĝin, ĉiu sin proponis esti la elaĉetoto kaj promesis iri kaj reveni plej rapide: ankaŭ mi min proponis, sed la renegato tute oponis al la projekto, dirante, ke li ne konsentus la liberigon de nur unu, kaj ke ni ĉiuj devus iri kune, ĉar la sperto instruis al li, ke la liberigintoj mave plenumas la promeson kiun ili faris en la bagno. Li aldonis, ke ofte precipaj kaptitoj uzis la procedon elaĉeti unu el ili, donis al li monon, ke li iru al Valencia aŭ Mallorca por ekipi barkon tie kaj reveni por fine forkonduki surmare la tutan grupon, sed la elaĉetitoj neniam revenis, ĉar la timo perdi denove la retrovitan liberon viŝis el ilia memoro ĉian sindevigon. Por konfirmi la veron de sia aserto li rakontis al ni skize, ke antaŭ nelonge kelkaj kristanaj kavaliroj travivis nekredeblan aventuron,^[169] kia neniam antaŭe okazis en tiuj landoj, kvankam tie ĉiutage havas lokon la plej konsternaj kaj mirigaj eventoj. Nu, la renegato konkludis, ke estus plej bone kaj konvene, se la monon destinitan al la elaĉeto de unu el ni, oni anstataŭe donus al li; tiam li akirus barkon en Alĝerio mem, sub la preteksto komercadi en Tetuán kaj laŭlonge de la marbordo; kiel mastro de la barko li povus facile efektiviĝi ian planon por forkonduki nin de la bagno en la barkon. Cetere, li aldonis, se la maŭrino donus la monon, kiel ŝi promesis, por ĉies elaĉeto, tiam ni povus enbarkiĝi tute senĝene eĉ en la mezo

de la tago. Li klarigis ke la pleja kompliko konsistis en tio, ke la maŭroj permesas al renegatoj aĉeti aŭ posedi, ne barkon, sed nur grandan ŝipon korsare uzeblan, ĉar ili suspektas, ke la aĉetanto de barko, precipe se li estas hispano, volas ĝin por eskapi al kristana tero; sed nia renegato solvus ĉi problemon prenante tagarinan maŭron^[170] kiel asocianon en la posedo de la barko kaj en la komercado de la varoj; per tia artifiko li fariĝus mastro de la barko, kaj la cetero de la projekto estus facile realigebla. Kvankam mi kaj miaj kompanoj opiniis pli bona la planon sendi unu akiri barkon en Mallorca, kiel la maŭrino sugestis, ni ne kuraĝis kontraŭdiri lin, ĉar ni timis, ke, se ni ne akceptus lian proponon, li denunciis nin kaj endanĝerigus nian vivon, precipe se li rivelus la rolon de Zoraida, por kies vivo ni volonte oferus la nian. Ni decidis do meti nin en la manojn de Dio kaj de la renegato, kaj tuj skribis al Zoraida, ke ni sekvas ŝian sugeston, ĉar ŝiaj konsiloj estis tiel bonaj, ke ŝajnis, ke Lela Marien inspiris ilin al ŝi; kaj ke nur de ŝi dependos la tuja efektivigo de la plano aŭ ties prokrasto. Mi ripetis mian promeson edziĝi al ŝi, kaj la sekvantan tagon, kiam ni denove troviĝis solaj en la bagno, ŝi donis al ni per la kano kaj la tuko, en diversaj okazoj, du mil eskudojn orajn, kune kun bileto diranta ke en la proksima *jumá* (t.e. vendredo) ŝi vojaĝos al la bieno de sia patro; ke ŝi liveros al ni pli da mono antaŭ sia foriro, kaj ke, se ĝi ne sufiĉus, ni devus sciigi al ŝi: ŝi donus al ni kiom ni volus, ĉar ŝia patro estas tiel riĉa, ke li ne rimarkus la mankon de ajna sumo, des malpli, ke ŝi havas la ŝlosilojn de ĉio.

»Ni donis tuj al la renegato 500 eskudojn por akiro de la barko; por 800 mi elaĉetis min jene, transdonante la monon al valencia komercisto, kiu troviĝis en Alĝerio; li elaĉetis min de la reĝo, promesante, ke li pagus la prezon ĉe la alveno de la unua ŝipo navigonta de Valencia. Se la komercisto tuj pagintus, la reĝo certe suspektus, ke la mono de mia elaĉeto troviĝis jam delonge en Alĝerio, kaj ke la komercisto retenis

ĝin por sia propra profito. Mia mastro tiel plenis de suspektemo, ke, efektive, mi tute ne kuraĝis, ke oni pagu tuj la tutan monon.

»En la ĵaŭdo, unu tagon antaŭ sia foriro al la bieno, Zoraida donis al ni mil pliajn eskudojn, sciigis al ni pri sia vojaĝo kaj petis min informiĝi tuj pri la situo de la bieno kaj nepre kapti la okazon iri tien por renkonti ŝin, se mi elaĉetus min. Mi respondis koncize, ke tion mi farus, kaj ke ŝi ne devus forgesi rekomendi nin al Lela Marien per la preĝoj, kiujn la sklavino lernigis al ŝi. Poste ni entreprenis la taskon elaĉeti miajn tri kompanojn, por fari la liberiĝon pli facila kaj por eviti ilian ĉagrenon, se ili, vidante min libera, sidus ankoraŭ en la bagno (kvankam ne mankis mono por ilia elaĉeto) kaj tiam la diablo inspirus al ili kovi ion kio implicus danĝeron kontraŭ Zoraida. Pro ilia karaktero, mi devintus allasi al mi nenian suspekton ĉi-rilate, sed mi ne volis elmeti la aferon al ajna risko. Tiel do, mi elaĉetis ilin laŭ la sama procedo, kiun mi uzis por elaĉeti min, nome, transdonante la monon al la komercisto, ke li liveru la necesan kaŭcion. Sed por eviti eventualan danĝeron, ni tute ne rivelis al li nian projekton kaj sekreton.

[166] Neologismo: Njo-knabo.

[167] Celante esti objekto de elaĉeto.

[168] La aŭtoro, Miguel de Cervantes Saavedra, aludas sin mem kaj siajn travivaĵojn kiel kaptito de la turkoj.

[169] Cervantes parolas pri iu el siaj provoj fuĝi el kaptiteco.

[170] Maŭro deveninta de Kastilio aŭ Aragono.

Ĉapitro 41

Kie la kaptito daŭrigas ankoraŭ sian historion

Antaŭ ol pasis dek kvin tagoj, nia renegato aĉetis tre bonan barkon kun sufiĉa spaco por pli ol tridek personoj; por prezenti la aferon komercan sub veraj koloroj kaj por protekti sin kontraŭ ajna suspekto, li intencis fari —kaj faris fakte— vojaĝon al Sargel, haveno sepdek du mejlojn for de Arĝelo, en la direkto al Orano, kie oni vigle komercas per sekaj figoj. Du tri fojojn li faris la saman vojaĝon en akompano de la menciita tagarino. En Berberio la maŭroj el Aragón ricevas la nomon tagarinoj, kaj la maŭroj el Granada la nomon mudeharoj; kaj en la regno de Fez la mudeharoj nomiĝas elĉoj, viroj prefere uzataj de la tiulanda reĝo en la militoj.

Nu, ĉiufoje kiam la renegato vojaĝis en sia barko, li haltis en golfeto situanta apenaŭ du sago-ĵetojn for de la bieno, kie Zoraida atendis; li haltis intence tie kun siaj junaj remistoj maŭraj por fari sian preĝadon aŭ por submeti al provo sian projekton. Ĉi-cele la renegato iris kelkfoje al la bieno de Zoraida peti fruktojn, kaj ŝia patro ilin donis al li. Li klopodis paroli kun Zoraida —kiel li diris al mi poste— por informi ŝin, ke, laŭ miaj instrukcioj, li forkondukus ŝin al kristana tero, kaj ke ŝi devus senti sin kontenta kaj fidoplena; sed li ne sukcesis en siaj klopodoj, ĉar la maŭrinoj lasas sin vidi de maŭroj aŭ turkoj, nur se iliaj patroj aŭ edzoj tion ordonas; tamen la maŭrinoj lasas sin trakti kaj alparoli de la kristanaj kaptitoj, eĉ pli ol decas. Verdire, mi afliktiĝus, se li povintus paroli kun ŝi, ĉar eble ŝi sentus alarmon, vidante, ke ŝian sorton oni konfidis al renegato. Sed Dio disponis alie kaj ne donis al li la okazon ŝin renkonti. La renegato, rimarkante ke li iras al kaj revenas de Sargel sen ia danĝero; ke li ankras

kie, kiam kaj kiel li volas; ke lia asocio, la tagarino, tute konformiĝas al lia volo kaj senreplike obeas lin; ke mi jam elaĉetis min, kaj ke mankas nur trovi kelke da kristanoj remontaj, petis min, ke mi ilin elektu, aldone al miaj tri kompanoj, kaj ilin kunvoku por la proksima vendredo, kiun tagon li difinis por nia forveturo. Mi priparolis do al dek du hispanoj, ĉiuj fortaj remantoj, viroj povantaj eliri el la urbo pli facile ol la ceteraj kaptitoj; kaj ne senpene mi trovis tiom da ili, ĉar en tiu tempo navigis dudek ŝipoj korsare, kie estis okupitaj ĉiuj remistoj disponeblaj. Kaj mi trovis la dek du nur pro tio, ke ilia mastro prizorgis la kompletigon de galero en la ŝipkonstruejo kaj ne partoprenis en tiu somero la korsaran ekspedicion. Mi diris al ili nur, ke en la vespero de la proksima vendredo, ili devus ŝteliri el la urbo, unu post unu, sin direkti al la bieno de Agi Morato kaj kaŝe atendi tie mian alvenon. Mi donis ĉi instrukcion al ĉiu aparte kaj avertis ilin, ke se ili renkontus tie aliajn kristanojn, ili diru nur, ke mi ordonis ilin atendi en la bieno.

Plenuminte ĉi parton de la plano, mi havis ankoraŭ por solvi la plej gravan: sciigi al Zoraida pri la stato de la aferoj kaj pri tio, ke ŝi estu atende preta kaj ne alarmiĝu, se ni subite forprenus ŝin, antaŭ ol ŝi imagus, ke la kristana ŝipo alvenis el Hispanujo. Tiel do, mi decidis iri al la bieno kaj, se eble, paroli kun ŝi: kaj unu tagon antaŭ mia forveturo, mi aperis tie kun la preteksto kolekti herbojn; la unua persono, kiun mi renkontis, estis ŝia patro, kaj li alparolis min en la lingvo uzata en la tuta Berberio, kaj eĉ en Konstantinopolo, inter maŭroj kaj kaptitoj: ĝi estas nek kastilia, nek maŭra, nek apartenanta al ajna nacio, sed mikso de ĉiuj lingvoj kaj per ĝi oni interkompreniĝas. Li do demandis al mi en ĉi ĵargono, kion mi serĉas en lia bieno kaj kies sklavo mi estas. Mi respondis, ke mi kolektas herbojn por fari salaton kaj apartenas al Arnaute Mamí (kaj tion mi asertis, ĉar mi bone sciis, ke Arnaute estis tre bona amiko lia). Poste li demandis, ĉu mi estas objekto de elaĉeto, kaj kiom mia mastro postulas

interŝanĝe por mi. Dum ni tiel babilis, la bela Zoraida, kiu jam de longe vidis min, eliris el la biendomo kaj tial, ke, kiel mi diris, la maŭrinoj ne zorgas montri sin antaŭ kristanoj, nek ilin evitas, ŝi sin direktis senĝene al la loko, kie mi parolis kun ŝia patro; kaj, kiam li vidis ŝin lante alpaŝi, li alvokis ŝin, ke ŝi venu.

Ne eblus al mi nun priskribi ŝin tia, kia ŝi aperis antaŭ miaj okuloj: belega kaj gracia, en riĉa kaj eleganta kostumo. Mi diru nur, ke de ŝiaj ravaj kolo, oreloj kaj haroj pendis perloj, pli multaj ol la haroj de ŝia kapo. Sur la maleoloj, nudaj laŭ la maŭra stilo, ŝi portis du *carcajes* (tiel nomiĝas en la araba la braceletoj de la piedoj) el purega oro, kun tiom da diamantoj inkrustitaj, ke ŝi poste diris al mi, ke ŝia patro taksis ilin je dek mil *doblas*; kaj la diamantoj de ŝiaj pojn-braceletoj valoris almenaŭ tiel multe. La perloj vidiĝis multegaj kaj de tre bona kvalito, ĉar la plej granda garno kaj fiero de la maŭrinoj konsistas en tio, ornamo sin per riĉaj perloj diversspecaj, tiele, ke en la maŭrolando ekzistas pli da perloj ol en la ceteraj regnoj kune. Laŭ la famo, la patro de Zoraida posedis multajn el la plej valoraj de Alĝerio kaj krome pli ol ducent mil hispanajn eskudojn, kies mastrino estis ĉi sinjorino mia. Imagu kiel ŝi brilis en tiel luksa garno, se konsideri, kiom multe de sia allogo ŝi retenas malgraŭ la misfortunoj, kiujn ŝi travivis. Kiel sciante, la belo de iuj virinoj dependas de la tagoj kaj de la okazoj kaj varias laŭ la cirkonstancoj; kaj estas nature, ke la emocioj de la animo influas pozitive aŭ negative tian belon, kvankam plej ofte ili ĝin detruas. Resume do, mi diru, ke ŝi aperis tiel riĉe garnita kaj tiel belega, ke ŝi ŝajnis al mi la plej rava virino de la mondo; kaj memorante mian ŝuldatecon al ŝi, mi ŝin rigardis kiel ĉielan diinon sobirintan al la tero por savi kaj feliĉigi min. Kiam ŝi proksimiĝis, ŝia patro diris al ŝi en ilia lingvo, ke mi estas sklavo de lia amiko Arnoute Mamí, kaj ke mi venis pluki herbojn por salato. Tiam ŝi alparolis min per la jam menciita lingvomikso, demandante ĉu mi estas kavaliro, kaj

kial mi ne elaĉetis min. Mi respondis, ke tion mi jam faris, kaj ke ŝi povus juĝi, kiel multe mia mastro taksis min, se konsideri, ke mi pagis al li por mia liberigo mil kvincent *zoltanís*. Al tio ŝi diris:

—Se vi apartenus al mia patro, mi ne permesus al li liberigi vin eĉ kontraŭ la duoblo de tiu sumo, ĉar vi, kristanoj, ĉiam mensogas kaj ŝajnigas vin senmonaj por trompi la maŭrojn.

—Eble vi pravas —mi diris— sed, koncerne min, mi traktis honeste kun mia mastro, same kiel mi traktas kaj traktos honeste kun ĉiuj homoj en la mondo.

—Kiam vi do foriros? —demandis Zoraida.

—Mi opinias, ke morgaŭ —mi respondis—, ĉar ĉi tie troviĝas ŝipo franca, kiu forvelos morgaŭ kaj mi intencas veturi sur ĝi.

—Ĉu ne pli bone atendi la alvenon de la hispana ŝipo, anstataŭ iri kun francoj, kiuj ne montriĝas tre amikaj al via lando?

—Ne —mi respondis—; —se vere venas ŝipo el Hispanujo mi atendos nur ĝis morgaŭ, ĉar mi deziras tiel multe troviĝi en mia lando inter la personoj, kiujn mi amas, ke mi ne havus paciencon atendi alian pli bonan okazon, se tio implicus prokraston.

—Sendube via edzino atendas vin en via lando —diris Zoraida—, kaj tial vi deziras rapidi.

—Mi ne estas edzo —mi respondis—, sed mi donis mian parolon tuj edziĝi ĉe mia alveno tie.

—Ĉu tre belas via futura edzino? —demandis Zoraida.

—Tiom, ke, se diri la veron pri ŝia beleco, ŝi tre similas al vi.

Ĉe tio ŝia patro forte ridis kaj ekkriis:

—Per Allah, kristano! Certe ŝi tre belas, se ŝi similas mian filinon, ĉar Zoraida estas la plej bela en la tuta regno. Bone ŝin rigardu kaj vi vidos, ke mi diras al vi la veron.

La patro de Zoraida funkciis kiel interpretanto la pli grandan parton de ĉi konversacio, ĉar, kvankam ŝi parolis la bastardan lingvon, kiu, kiel dirite, estas tie uzata, ŝi esprimis sin per gestoj pli ol per vortoj. Nu, ni tiele babilis, kiam unu maŭro alkuris al ni, kriante, ke kvar turkoj, transgrimpinte la muron de la ĝardeno, plukadis la fruktojn, kvankam ili ankoraŭ ne maturiĝis. La oldulo, same kiel Zoraida, alarmiĝis, ĉar la maŭroj ĝenerale sentas preskaŭ instinktan timon kontraŭ la turkoj, precipe kontraŭ ties soldatoj, kiuj tiranece kaj insolente traktas la maŭrojn, siajn regatojn, pli mave ol sklavojn.

La patro de Zoraida diris do al ŝi:

—Reiru en la domon kaj enŝlosu vin; dume, mi iros paroli al tiuj hundoj; kaj vi, kristano, prenu viajn herbojn, sekvu pace vian vojon kaj Allah konduku vin en sekureco al via lando.

Mi riverencis, li iris serĉi la turkojn, kaj mi restis sola kun Zoraida, kiu komencis ŝajnigi, ke ŝi alpaŝas al la domo, kiel ŝia patro ordonis. Sed apenaŭ li malaperis inter la arboj de la ĝardeno, ŝi turnis sin al mi kun la okuloj plenaj de larmoj kaj diris:

—*Támxix*, kristano, *támxix*? —kio signifas, «ĉu vi foriros, kristano, ĉu vi foriros?».

—Jes, sinjorino, sed tute ne sen vi. Atendu min en la venonta vendredo, kaj ne ektimu, kiam vi nin vidos; certe ni ĉiuj

atingos kristanan teron.

Tiam ŝi komprenis tre bone la sencon de ĉio, kion mi antaŭe aludis en nia konversacio, kaj, metante unu brakon ĉirkaŭ mian kolon, ŝi komencis iri al la domo per tirataj paŝoj; volis la Fortuno —kaj ĉio estus finiĝinta tre mave se la ĉielo decidus alie—, ke, kiam ni iradis laŭ la dirita maniero, kun ŝia brako ĉirkaŭ mia kolo, ŝia patro, revenante post ol li elirigis la turkojn, vidis nin en tiel kompromita situacio; sed Zoraida, sagaca kaj aplomba, anstataŭ retiri la brakon de mia kolo, pli premis sin al mi, apogis la kapon al mia brusto, iom fleksis la genuojn, ŝajnigante, ke ŝi svenas; dume mi simulis, ke mi malgraŭvole subtenas ŝin. Ŝia patro alkuris al ni, kaj, vidante sian filinon en stato, li demandis al ŝi, kio al ŝi okazas; sed, ĉar ŝi ne respondis, la diris:

—Sendube ŝi svenis de timo pro la enrompo de tiuj hundoj en la ĝardenon.

Li apartigis ŝin de mia brusto kaj ŝin premis al la sia; ŝi eligis profundan suspiron, kaj, kun la okuloj ankoraŭ humidaj pro la larmoj, diris:

—*Ámexi, kristano, _ámexi* —«foriru, kristano, foriru».

Al tio, ŝia patro respondis:

—Ne necesas, ke la kristano foriru. Li faris al vi nenian damaĝon, kaj la turkoj jam forglitis. Ne timu, ĉar ne ekzistas kaŭzo por zorgi; kiel dirite, la turkoj obeis mian peton kaj foriris sur la sama vojo de sia alveno.

—Vi pravas, sinjoro. Ŝi timiĝis pro ili —mi diris al li—. Sed, ĉar ŝi diras, ke mi foriru, mi ne deziras ĝeni ŝin; pacon al vi, kaj, se vi permesus, mi revenos, se necese, plu kolekti herbojn en la ĝardeno; laŭ mia mastro, nenie kreskas salat-herboj pli bonaj ol ĉi tie.

—Venu tiel ofte kiel vi volos —respondis Agi Morato—. Mia filino diris tion, ne tial, ke vi aŭ iu el la kristanoj ĝenis ŝin; eble ŝi konfuzis vin kun la turkoj, aŭ simple pensis, ke vi jam devus iri kolekti la herbojn.

Ĉe tio mi tuj adiaŭis ilin ambaŭ; ŝi foriris kun sia patro kaj aspektis kvazaŭ ŝia koro ŝiriĝus. Tiam, sub la preteksto kolekti la salat-herbojn, mi vagis laŭplaĉe tra la ĝardeno kaj atente rimarkis la enir- kaj elir-eblecojn, kaj la obstaklojn, kiujn prezentus la domo kontraŭ enrompo, kaj ĉion, kio povus faciligi la plenumon de mia plano. Tuj poste mi foriris de tie kaj informis al la renegato kaj al miaj kompanoj pri ĉio okazinta; mi apenaŭ havis paciencon por atendi la horon ĝui trankvile la feliĉon, kiun la Fortuno liveris al mi en la persono de la bela Zoraida. Sed la tempo pasis, kaj fine alvenis la tiel dezirataj tago kaj momento; kaj sekvante nian planon, frukton de longa konsiderado kaj de matura studo, ni sukcesis, kiel ni esperis. La vendredon sekvantan al la tago de mia interparolo kun Zoraida en la ĝardeno, nia renegato ankris la barkon, ĉe la noktiĝo, preskaŭ fronte al la domo kie la belega Zoraida loĝis.

La kristanoj uzontaj la remilojn jam gvatadis, dise kaŝitaj en la ĉirkaŭo, kaj atendis min ekscitite kaj kun tumulte ĝoja koro, avidaj ataki la barkon starantan antaŭ iliaj okuloj; ili ja sciis nenion pri la plano de la renegato kaj pensis, ke ili rekiros la liberon masakrante la maŭrojn, kiuj sidis en la barko. Okazis do, ke tuj kiam mi kaj miaj kompanoj montris nin, la kaŝitoj iom post iom venis aliĝi al la grupo. En tia horo, la pordegoj de la urbo statis jam fermitaj, kaj en la tuta kamparo eĉ ne unu persono videblis. Sed, kiam ni ĉiuj estis kune, ni ne sciis, ĉu konvenus unue iri preni Zoraidan aŭ submeti la maŭrajn remistojn: dum ni tiel dubis, la renegato venis al ni kaj demandis, kial ni staras neniofare, kaj aldonis, ke jam estas la tempo ekagi, ke liaj maŭroj tute ne gardas sin, kaj ke la pliparto dormas. Ni sciigis al li la motivon de nia

hezitemo, kaj li respondis, ke la ĉefa afero estas okupi la ŝipon, ke tian operacion oni povus fari facile kaj sendanĝere, kaj ke poste ni irus serĉi Zoraidan. Ni opiniis lian konsilon bona, do sen plia halto kaj sub lia gvidado proksimiĝis al la barko. La renegato ensaltis la unua, eksvingis cimitaron kaj kriis en la maŭra:

—Neniu el vi moviĝu, se vi ne volas perdi la vivon!

Jam ĉi-momente preskaŭ ĉiuj kristanoj troviĝis sur la barko. La maŭroj havis ne tre kuraĝan animon kaj teruriĝis ĉe la vortoj de sia ŝipestro, do eĉ ne unu faris movon por helpi sin per la armiloj (cetero, apenaŭ kelkaj maŭroj, aŭ neniu, portis ilin kun si), kaj senvorte lasis sin manligi de la kristanoj, kiuj tion faris rapide, minacante la maŭrojn tuj ponardi ilin, se ili elpuŝus la plej etan krion de alarmo. Tuj poste, la duono de la kristanoj restis garde sur la barko, kaj la ceteraj, mi inter ili, iris, ankoraŭ sub la gvido de la renegato, al la ĝardeno de Agi Morato; bonŝance la pordo cedis facile, kvazaŭ ĝi estus ne ŝlosita, kaj tiel, en silento kaj kvieto ni alvenis nerimarkite al la domo.

La belega Zoraida atendis nin ĉe fenestro, kaj, tuj kiam ŝi aŭdis moviĝon de homoj, demandis softe, ĉu ni estas *nizarani*, t.e. kristanoj. Mi respondis jese kaj petis ŝin sobiri. Ŝi rekonis min kaj hezitis eĉ ne momenton, ĉar senvorte ŝi tuj descendis, apertis la pordon kaj montriĝis al ĉiuj tiel bela kaj tiel riĉe garnita, ke mi ne kapablus priskribi ŝin. Mi prenis ŝian manon kaj ĝin kisis, kaj tion saman faris la renegato kaj miaj tri kompanoj; la ceteraj, kvankam ili ne komprenis la situacion, imitis min, pensante, ke ni dankas kaj rekonas ŝin, kiel nian liberodonan sinjorinon. Tiam la renegato demandis ŝin en la maŭra, ĉu ŝia patro troviĝas en la domo. Ŝi respondis jese kaj aldonis, ke li dormas.

—Nu, necesas lin veki —respondis la renegato—; ni prenos lin kun ni kaj ankaŭ ĉion valoran de ĉi domo.

—Ne —ŝi diris—. Ne pre oni ne tuŝu mian patron. Kaj en ĉi domo nenio valora troviĝas, krom tio, kion mi kunportos. Ĝi sufiĉos por igi vin ĉiujn riĉaj kaj feliĉaj. Atendu momenton kaj vi vidos.

Ĉe tio ŝi reeniris, promesante tuj reveni kaj rekomendante al ni teni nin kvietaj kaj silentaj. Mi demandis al la renegato, kion do li ĵus interparolis kun Zoraida, kaj, kiam li informis min pri ilia konversacio, mi diris, ke la volon de Zoraida oni ne pre obeu. Tiam ŝi revenis kun kofreto plena de oraj eskudoj tiel peza, ke ŝi apenaŭ povis porti ĝin. Bedaŭrinde, ŝia patro vekigis ĉi-momente, aŭdis la bruon leviĝantan de la ĝardeno, elrigardis tra fenestro, vidis la grupon de kristanoj, kaj komencis laŭte kaj sovaĝe krei en la araba: «Kristanoj, kristanoj! Latronoj, latronoj!». Ĉi krioj metis nin en grandan timon kaj embarason, sed la renegato, vidante la danĝeron, kie ni troviĝis, kaj konsciante, ke tre gravis efektiviĝi nian tutan planon, impetis kun kelkaj kompanoj sur la ŝtuparo supren ĝis la ĉambro de Agi Morato, sed mi ne kuraĝis lasi Zoraidan sola, ĉar ŝi jam svenis inter miaj brakoj. Resume, la suprintaj viroj tiel efike agis, ke tre baldaŭ ili reaperis kun Agi Morato, kies manoj vidiĝis kunligitaj, kaj kies buŝo estis ŝtopita per poŝtuko, ke li ne krii; krome, ili minacis mortigi lin, se li elpuŝus la plej etan krion. Kiam lia filino lin rimarkis, ŝi kovris al si la okulojn por ne vidi lin, kaj ŝia patro tre teruriĝis, se konsideri, ke li ne sciis, kiel volonte ŝi metis sin en niajn manojn. Tiam ni plej bezonis uzi la piedojn, do hastis en la barkon, kie la aliaj senpacience atendis, timante, ke ia misfortuno trafis nin.

Proksimume du horoj post noktomezo pasis, kiam ni ĉiuj troviĝis en la barko, kaj tie oni demetis de la patro de Zoraida la ligilon el la manoj kaj la tukon el la buŝo; sed la

renegato ripetis sian minacon preni de li la vivon, se li dirus unu solan vorton. Agi Morato komencis profunde suspiri vidante tie sian filinon, kaj des pli veis, kiam li rimarkis, ke mi forte brakumas ŝin, kaj ke ŝi, sen defendi sin kaj sen plendi, tion permesas; tamen, li plu silentis pro timo, ke oni efektivigus la minacon de la renegato. Kiam Zoraida rimarkis surŝipe ke oni jam pretiĝas remi, kaj ke ŝia patro, kun la aliaj maŭroj ankoraŭ ligitaj, plu sidas en la barko, petis min, pere de la renegato, ke mi faru al ŝi la favoron meti en liberon la maŭrojn kaj ŝian patron; ŝi aldonis, ke ŝi prefere ĵetus sin al la maro, ol vidi ke pro ŝia kulpo, oni traktas ŝian patron, kiu tiel multe ŝin amis, kiel kaptiton. La renegato tradukis ŝian peton, kaj mi respondis, ke mi volonte konsentas ĝin, sed li objctis, ke, se ni liberigus ilin, ili krius alarmon en la urbo, kaj sekve oni ĉasus nin per kelkaj leĝeraj fregatoj, kaj barus al ni la vojojn de la tero kaj de la maro, tiel, ke ni ne povus eskapi; li aldonis, ke pli konvenus liberigi ilin, kiam ni alvenus al kristana tero. Ni ĉiuj akceptis lian konsilon, kaj ankaŭ Zoraida konsentis, kiam oni informis al ŝi, kial ne konvenus fari tuj, kion ŝi deziris; poste en ĝoja silento kaj kun vigla entuziasmo ĉiu el niaj bravaj remantoj prenis sian remilon, kaj, elkore rekomendante nin al Dio, ni komencis navigi ale al la insulo Mallorca, la plej proksima tero kristana; sed, ĉar blovis iom da tramontano kaj la maro videble agitiĝis, ne estis al ni eble teni nin en la rumbo al Mallorca, kaj ni devis veturi laŭlonge de la bordo ale al Orano, timante, ke oni povus rimarki nin de Sargel, urbo situanta sur ĉi sama bordo sesdek mejlojn for de Alĝero; krome ni timis renkonti ajnan el la galeretoj ordinare uzataj por transporto de varoj el Tetuán; tamen, ĉiu per si, kaj ĉiuj kune, pensis, ke se ni renkontus ian komercan galereton, kondiĉe, ke ĝi ne estus armita por kaperado, ni riskus nenion kaj plie ni kaptus la ŝipon, kie ni finus pli sekure la vojaĝon. Dum la navigado, Zoraida tenis la kapon inter miaj manoj por ne vidi sian patron, kaj mi sentis, ke ŝi alvokas sur nin la protekton de Lela Marien.

Veturinte proksimume tridek mejlojn, kaj jam ĉe la tagiĝo, ni rimarkis, ke ni distancas de la bordo tri arkebuzpafojn: ĝi vidiĝis dezerta, sen loĝantoj, kiuj povus nin observi; sed ni preferis remante interniĝi sur la maro iom pli serena jam; kaj kiam ni distanciĝis ses mejlojn de la bordo, oni ordonis alterne remi, por ke ĉiu duono de la remantoj havu tempon por manĝi, se konsideri, ke en la barko sidis sufiĉe da provizoj; sed la remantoj diris, ke ne konvenus moderigi nun la iron de la ŝipo, kaj ke, tiuj, kiuj ne remis, povus enbuŝigi al ili la manĝon, ĉar ili tute ne volis eĉ por momento delasi la remilojn. Oni faris kiel ili deziris, kaj ĉe tio ekblovis forta vento: ĝi devigis nin hisi la velojn, ĉesi remi kaj stiri ale al Orano, ĉar ne eblis sekvi sur alia direkto. Oni rapide faris la manovron, la barko velis pli da ok mejloj ĉiuhore, kaj ni timis jam nenion krom la eventuala renkonto kun ajna kapera ŝipo. Ni donis manĝi al niaj maŭroj, kaj la renegato konsolis ilin dirante, ke ili ne konsideru sin kaptitoj, kaj ke en la unua okazo, oni liberigus ilin. La samon oni diris al la patro de Zoraida, kaj li respondis:

—Ion ajn mi kredus kaj esperus de via favorkoreco kaj de via bona dispozicio, ho kristanoj, sed ne pensu, ke mi estas tiel naiva imagi, ke vi lasos min libera. Vi ne submetis vin al la danĝero rabi min nur por grandanime redoni al mi la liberon, des malpli, se konsideri, ke vi scias, kiu mi estas, kaj ke vi povas postuli tre multe da mono por mia reliberigo. Vi mem diru la sumon, kaj mi pagos kiom ajn vi volos por mi kaj por mia kompatinda filino: eĉ nur por ŝi sola, kiu estas la pli granda kaj bona parto de mia animo.

Tion dirante, li komencis tiel amare plori, ke li kortuŝis nin ĉiujn. Zoraida ne povis ne alrigardi lin kaj sentis tiel profundan emociion antaŭ lia plorado, ke ŝi levis sin de apud mi kaj impetis lin brakumi. Ŝi almetis sian vizaĝon al la lia, kaj tiel korŝire ploris kun li, ke multaj el ni faris la samon.

Sed vidante ŝin en ties plej bela kostumo kaj garnita per granda nombro da juveloj, ŝia patro diris al ŝi en sia lingvo:

—Kion signifas ĉi tio? Hieraŭ nokte, antaŭ ol falis sur nin ĉi terura misfortuno, mi vidis vin en via hejma, ordinara robo, kaj nun, kvankam vi ne havis sufiĉan tempon por ŝanĝi veston, kaj kvankam okazis nenio, kio meritis celebron per speciala tualetto, vi aperas en la plej bela kostumo, kiun mi povis donaci al vi, kiam la sorto montriĝis al ni pli favora. Klarigu al mi ĉi enigmon, ĉar ĝi alarmas kaj surprizas min pli ol mia nuna misfortuno.

Kion la maŭro diris al sia filino, tion tradukis al mi la renegato, sed ŝi respondis eĉ ne unu vorton. Sed kiam Agi Morato rimarkis ĉe unu flanko de la barko la kofreton, kie ŝia filino gardis siajn juvelojn, kaj kiun li mem ne kunportis al la biendomo sed lasis en Alĝero, li eĉ pli konfuziĝis kaj demandis al ŝi, kiel la kofreto trafis en niajn manojn. Antaŭ ol Zoraida respondus, la renegato diris:

—Ne ĝenu vin, sinjoro, farante al via filino tiom da demandoj, ĉar per unu sola vorto mi povus respondi ilin ĉiujn: sciu, do, ke ŝi estas kristanino, kaj ke ŝi kvazaŭ trafajlis nian katenon, liberigante nin de nia kaptiteco. Ŝi akompanas nin propravole, kaj, mi imagas, ŝi ĝojas vidi sin en situacio simila al tiu de homo elpaŝanta el tenebro en lumon, el morto en vivon, el doloro en gloron.

—Ĉu li diras la veron, filino? —demandis la maŭro.

—Jes —respondis Zoraida.

—Ĉu efektive vi estas kristanino kaj metis vian patron en la manojn de liaj malamikoj? —demandis la oldulo.

—Kristanino mi ja estas; sed mi ne puŝis vin en vian nunan staton, ĉar neniam mi deziris forlasi vin aŭ fari mavon al vi,

sed nur serĉi mian propran bonon.

—Kaj kian bonon vi renkontis, filino?

—Demandu tion al Lela Marien; ŝi respondus al vi pli bone ol mi kapablus.

Apenaŭ tion aŭdinte, la maŭro ĵetis sin kapantaŭe kaj kun neimagebla rapido en la maron, kie li certe dronus, se lia longa kaj pufa robo ne tenus lin duonflosanta en la akvo. Zoraida kriis al ni, ke oni lin savu; ni ĉiuj tuj alkuris helpi kaj, kaptante lin je la vesto, eltiris lin senkonscia kaj preskaŭ droninta. La junulino tiel afliktiĝis, ke ŝi ploris super li tenere kaj lamente, kvazaŭ li jam mortus. Ni turnis lin vizaĝalteren, el lia interno elfluis multe da akvo kaj post du horoj li rekonsciiĝis; dume la vento ŝanĝiĝis kaj puŝis nin ale al la bordo, kaj nur per forta remado ni evitis kolizion kontraŭ la teron; bonŝance ni alvenis al golfeto situanta apud promontoro aŭ kabo nomata de la maŭroj «kabo de la Cava Rumía», kio en nia lingvo signifas «kabo de la malĉasta kristanino»; inter la maŭroj ekzistas la tradicio, ke tie kuŝas enterigita la Cava, virino pro kies pekado okazis la perdiĝo de Hispanujo. Ili eĉ rigardas misaŭgura ĉi lokon, kie ili do ĵetas la ankron nur en okazoj de ekstrema nepreco; tamen ĝi estis al ni, ne ia kaŝejo de malĉasta virino, sed sekura haveno, se konsideri, ke la maro jam vere furiozis.

Ni postenigis sentinelojn sur la bordo, ne ellasis la remilojn el la manoj eĉ unu momenton, manĝis el la provizoj de la renegato kaj fervore petis de Dio kaj de nia Sinjorino, ke ili helpu kaj favoru nin kronante per feliĉa fino la aventuron tiel sukcese komencitan. Je petoj de Zoraida oni ordonis surbordigi ŝian patron, kune kun la aliaj maŭroj ankoraŭ ligitaj, tial, ke, pro sia ŝanceliĝanta kuraĝo kaj kompatema koro, ŝi ne povis elporti vidi sian patron ligita kaj siajn samlandanojn kaptitaj. Ni promesis al ŝi, ke ni liberigus ilin

ĉe la momento de nia foriro, ĉar en tiel senhoma loko ne estus danĝere restigi ilin.

Ni ne vane preĝis; la ĉielo ne ignoris nin: la vento ŝanĝiĝis denove, kaj la maro kvietiĝis kvazaŭ invitante nin daŭrigi ĝoje la veturon. Tiam ni deligis la maŭrojn kaj surbordigis ilin unuope, ĉe ties granda miro, sed kiam venis la vico elbarkigi la patron de Zoraida, jam plene rekonsciiĝintan, li diris:

—Ĉu vi scias, kristanoj, kial ĉi perversa virino ĝojas je mia liberiĝo? Ĉu vi opinias, ke ŝin movas ia kompato al mi? Ne, tute ne; ŝi ĝojas, ĉar mia ĉeesto embarasus ŝin, kiam ŝi volus plenumi siajn fiajn dezirojn. Ankaŭ ne pensu, ke ŝi ŝanĝis sian religion, ĉar ŝi kredas, ke la via superas la nian; tion ŝi faris tial, ke ŝi scias, ke en via lando oni pli libere diboĉas ol en la nia.

Poste li sin turnis al Zoraida, kaj, dum mi kaj alia kristano retenis lin je la brakoj por eviti ajnan frenezaĵon de lia flanko, li diris:

—Ho, perversa kaj miskonsilita knabino! Kien vi iras, blinde kaj senpense, en la manoj de ĉi hundoj, naturaj malamikoj niaj? Damnon al la horo, kiam mi generis vin, kaj damnon al la regaloj kaj plezuroj inter kiuj, dank' al mi, vi elkreskis!

Kiam mi vidis, ke li ne havas intencon baldaŭ fini sian plendadon, mi ordonis tuj surbordigi lin, kaj de la strando li plu malbenis kaj lamentis plenvoĉe, preĝante al Mahometo, ke li petu de Allah konfuzi, detruu kaj ekstermi nin. Kaj kiam ni hisis la velojn kaj ne plu aŭdis liajn vortojn, ni vidis liajn farojn, nome, li deŝiris al si la barbon kaj la harojn kaj rulis sin sur la tero. Sed unu fojon li tiel levis la voĉon, ke ni povis aŭdi lin diri:

—Revenu, kara filino, revenu teren! Ĉion mi pardonas al vi! Lasu la monon al tiuj viroj, kaj venu konsoli ĉi tristan patron vian, se vi ne volas, ke mi perdu la vivon sur ĉi soleca sablo!

Ĉion aŭskultis Zoraida kaj ĉion priploris kun dolora koro, sed responde ŝi sciis diri nur:

—Volu Allah, ke Lela Marien, pro kies inspiro mi iĝas kristanino, konsolu vin en via aflikto, kara patro! Allah bone scias, ke mi ne povus agi alie, kaj ke en tio ne influis ĉi kristanoj, ĉar, eĉ se mi volus ne akompani ilin, estus al mi neeble resti hejme: ĝis tia ekstremo la animo urĝis min al la plenumo de ĉi decido, tiel bona laŭ mia opinio, kiel mava laŭ via juĝo.

Tion ŝi diris, kiam ŝia patro ne plu aŭdis ŝin, kaj kiam ni ne plu lin distingis. Mi klopodis konsoli Zoraidan, dum ni ĉiuj priatentis la iron de nia barko, kies veturadon faciligis nun la vento, tiele, ke ni estis certaj alveni en la mateniĝo de la sekvanta tago al la hispana bordo. Sed, ĉar la bono preskaŭ neniam, aŭ neniam, venas simpla kaj nemiksita, sed akompanata aŭ sekvata de ia angora aŭ perturba misfortuno, okazis ke, kaŭze de nia sorto, aŭ eble kaŭze de la malbenoj de la maŭro kontraŭ lia filino (tiaj malbenoj timindas, kiam ilin diras ajna patro), proksimume je la tria matene kaj jam sur la alta maro, navigante kun plenblovitaj veloj kaj kun la remiloj levitaj —ĉar la favora vento ŝparis al ni la laboron ilin uzi—, ni vidis je la helo de la lunlumo, ke tre proksima ŝipo kun kvadrataj veloj iom lofas sin kaj komencas preterpasi antaŭ nia pruo; tiel multe ĝi proksimiĝis, ke ni devis brajli por eviti kolizion, dum en la alia ŝipo oni faris abruptan rudro-manovron por lasi al ni spacon por pasi. Oni grupiĝis ĉe la pavezo de la nekonata ŝipo kaj demandis al ni, kiuj ni estas, de kie ni venas kaj kien ni iras. Sed, ĉar ili parolis en la franca, la renegato konsilis al ni:

—Ne respondu! Sendube ili estas francaj piratoj, kiuj rabas ĉion kapteblan.

Obeante ĉi averton, oni respondis nenion. Sed, kiam ni iom antaŭeniĝis, kaj la alia ŝipo jam troviĝis ĉe nia leo, subite ĝi pafis kontraŭ nin du parojn da kanonkugloj; ŝajne ĉiu paro estis kunligita per ĉeno, ĉar la unua fortranĉis ĉe la mezo nian maston, kies supra parto falis kun la veloj en la maron; tuj sekve la dua paro trafis plene la korpon de la barko kaj faris al ĝi egan truon sed ne alispecajn damaĝojn; konstatante, ke la barko eksinkas, ni ĉiuj komencis plenvoĉe krii helpon, petante de la ŝipanoj, ke ili prenu nin en sian ŝipon, ĉar la nia mergiĝas. Tiam ili brajlis la velojn, surmarigis boaton, kaj dek du bone armitaj francoj kun arkebuzoj kaj brule pretaj meĉoj ensaltis en ĝin, proksimiĝis al ni kaj rimarkinte, ke ni estas malmultaj, kaj ke nia barko dronas, prenis nin en sian boaton kaj diris, ke ili kanonis nin, ĉar ni malĝentilis, kiam ni silentis ĉe iliaj demandoj. Dume la renegato, preninte la kofreton kun la juveloj de Zoraida, nerimarkate ĵetis ĝin en la maron.

Nu, ni ĉiuj pasis al la ŝipo de la francoj, kiuj, demandinte nin pri ĉio, kion ili volis scii, forprenis de ni ĉion, kvazaŭ ni estus iliaj ĝismortaj malamikoj, kaj prirabis de Zoraida eĉ la braceletojn de ŝiaj maleoloj. Sed la aflikto de Zoraida ne premis min tiel multe kiel mia propra timo, ĉar mi pensis, ke ili, forpreninte ŝiajn rarajn kaj valoregajn juvelojn, ne hezitus senigi ŝin de la juvelo, kiun ŝi plej alte taksis kaj trezoris; bonŝance, la avido de tiaj viroj ne etendiĝas preter la mono, kvankam ĉi-rilate ilia posedemo estas nesatigebla; ĉi-okaze ilia avido montriĝis tiel ekstrema, ke eĉ je niaj vestaĉoj de kaptitoj ili senigus nin, se ili iel profitus per tio.

Kelkaj piratoj volis eĉ ĵeti nin, envolvitajn en velon, al la maro, ĉar ili havis la intencon komerci kun hispanaj havenurboj, ŝajnigante sin bretonoj, kaj, se ili lasus nin vivaj,

ilia rabo diskoniĝus, kaj oni punus ilin. Sed la kapitano —kaj prirabinto de mia kara Zoraida— diris, ke li kontentiĝas per la predo, kiun li jam havas, kaj ke, anstataŭ halti en ajna hispana haveno, li preferas transgliti la markolon de Gibraltar kaj direkti sin al Roĉelo, kie estis komencinta lia vojaĝo; ili do interkonsentis doni al ni la boaton de la ŝipo kaj ĉion necesan por la kurta navigado, kiun ni devus ankoraŭ fari. Ili plenumis ĉi promeson la sekvantan matenon, tre proksime al la hispana bordo, ĉe kies vido ni tute forgesis niajn zorgojn kaj mizerojn, kvazaŭ ni spertintus ilin neniam: tiel grandan ĝojon kaŭzas libero retrovita.

Proksimume je la tagmezo ili ĵetis nin en la boaton, provizis nin per du bareloj da akvo kaj kelke da biskvito, kaj la kapitano, tuŝita de mi ne scias kia kompato, en la momento kiam la belega Zoraida enboatiĝis, donis al ŝi kvardek or-eskudojn, kaj ne permesis, ke liaj soldatoj forprenu de ŝi ĉi kostumon, kiun ŝi nun portas. Jam en la boato, ni dankis ilin pro ĉi lasta bonfaro, kaj montris nin pli ŝuldosentaj ol plendemaj; ili sin direktis al la alta maro, survoje al la markolo de Gibraltar. Rigardante nur la teron, kiu, kvazaŭ gvida stelo, montriĝis antaŭ niaj okuloj, ni tiel rapide remis, ke ĉe la sunsubiro ŝajnis al ni, ke ni povus albordiĝi antaŭ ol pasus longa parto de la nokto; sed, ĉar mankis la luno, kaj la ĉielo vidiĝis obskura, kaj ni ne sciis, kie ni troviĝis, multaj el ni opiniis, ke ne estus prudente albordiĝi, kvankam aliaj deziris fari tian manovron, eĉ inter rokoj kaj je longa distanco de loĝataj lokoj: tiel ni ne plu havus la prave motivitan timon renkonti iun el la piratoj de Tetuán, kiuj forvelas de Berberio en la nokto, atingas ĉe la mateniĝo la hispanan bordon, predas tie, kaj revenas hejmen por dormi. Sed el la diversaj opinioj ni elektis la jenan: proksimiĝi iom post iom kaj, se la maro montriĝus sufiĉe kvieta, elboatiĝi kie ajn ni povus. Ĉi planon ni sekvis kaj, iom antaŭ la noktomezo, ni alvenis al la piedo de alta monto, kiu staris je ioma distanco de la maro kaj lasis iom da spaco konvena por

albordiĝo. La boato puŝiĝis en la sablon, ni ĉiuj elsaltis sur la teron, kisis la grundon kaj, kun larmoj de ĝojego, dankis Dion, Nian Sinjoron, pro ties netaksebla favorkoreco; poste ni elprenis el la boato niajn provizojn, haŭlis ĝin el la sablo kaj surpriris grandan parton de la monto, ĉar ni ankoraŭ ne sentis nin tre sekuraj nek plene konsciis, ke ni staris sur kristana tero.

Alvenis fine la aŭroro, pli lante, ŝajnis al mi, ol ni dezirus. Ni ĵus surpriris ĝis la pinto de la monto por vidi, ĉu oni distingas de tie ian loĝatan lokon aŭ paŝtistan kabanon. Sed malgraŭ tio, ke ni streĉis la okulojn, videblis nek vilaĝo, nek homo, nek pado, nek vojo. Tiam ni decidis plu penetri en la landon, ĉar ŝajnis nekredeble, ke ni ne renkontus baldaŭ ajnan personon, kiu sciigus nin, kie ni troviĝis. Sed plej afliktis min, ke Zoraida iris piede sur tiaj krutaĵoj. Kvankam kelkfoje mi portis ŝin sur miaj ŝultroj, tamen la timo min lacigi ne lasis ŝin ĝui la komforton de la ripozo, do ŝi tute rifuzis tian helpon de mia flanko; tre pacience, kun elmontroj de kontento kaj tenante sin je mia mano, Zoraida iris apud mi proksimume unu mejlon, ĝis ni aŭdis la sonon de tintileto, kio klare montris, ke ie proksime troviĝas ŝafogregoj; ni atente ĉirkaŭrigardis por distingi ĝin kaj fine vidis junan paŝtiston, kiu lante kaj trankvile prilaboris vergon per tranĉilo. Ni laŭte vokis lin, li levis la kapon, rapide stariĝis kaj —tion ni poste sciis— vidis unue Zoraidan, kaj la renegaton en ties maŭraj kostumoj, pensis, ke la tuta berbera gento alsaltas al li, fuĝis kun surpriza impeto en apudan arbaron kaj komencis alarmi per la plej laŭtaj krioj de la mondo:

—Maŭroj, maŭroj surlande! Maŭroj, maŭroj! Ek al la armiloj!
Al la armiloj!

Tute konfuzitaj de la krioj de la paŝtisto ni ne sciis kion fari, sed konsiderante, ke lia voĉo alarmus ĉie, kaj ke sekve la

kavalerio prigardanta la bordon baldaŭ alrajduŝ por vidi kio okazas, ni decidis, ke la renegato demetu sian turkan kostumon kaj vestu sin per la kazako de kaptito: tian pecon donis unu el ni al la renegato, konservante sur si nur la ĉemizon. Tiel, rekomendante nin al Dio kaj ekirante sur la sama vojo sekvita de la paŝtisto, ni esperis ĉiumomente la aperon de kavalerianoj. Ni ne trompiĝis, ĉar ne pasis du horoj, kiam, elpasinte el la kruta erikejo kaj jam sur ebena lando, ni vidis proksimume kvindek virojn rajdi al ni duongalope. Ni haltis atende, sed, kiam ili alvenis kaj rimarkis, ke tie staras nur grupo de kompatindaj kristanoj, anstataŭ la serĉataj maŭroj, ili surpriziĝis, kaj unu rajdisto demandis, ĉu kaŭze de ni la paŝtisto kriis alarmon.

—Jes —mi respondis. Sed, kiam mi pretis rakonti ĉion okazintan, kiuj ni estas kaj de kie ni venas, unu el la kristanoj de nia grupo rekonis la kavalerianojn kaj intervenis, sen ke mi povus paroli ion plian.

—Dank' al Dio, sinjoroj, ke Li kondukis nin al ĉi loko —li diris—. Ĉar se mi ne trompas min, ni staras sur tero proksima al Vélez Málaga. Kaj se miaj jaroj de kaptiteco ne forviŝis vin, sinjoro, el mia memoro, vi, kiu demandas nin pri nia identeco, estas mia onklo Pedro de Bustamante.

Apenaŭ diris tion la kristana kaptito, kiam la rajdisto saltis de sur la ĉevalo kaj brakumis la junulon, dirante:

—Mia karega nevo, mi jam rekonas vin! Mi, mia fratino (patrino via) kaj viaj ceteraj familianoj priploris vin kiel mortintan. Dio volis konservi al ili la vivon, por ke ili havu la plezuron revidi vin; ni sciis, ke vi troviĝis en Alĝerio, kaj, se juĝi laŭ la stato de la vestoj viaj kaj de viaj kompanoj, vi retrovis preskaŭ mirakle la liberon.

—Vi pravas —respondis la junulo—, kaj ni havos tempon por ĉion rakonti.

Kiam la kavalerianoj vidis, ke ni estas kristanaj kaptitoj, ili desaltis de siaj bestoj kaj ĉiu proponis sian ĉevalon, ke ni rajdu al la urbo Vélez Málaga, proksimume kvin mejlojn for. Ni diris al ili, kie ni lasis la boaton, kaj kelkaj iris tien por transporti ĝin al la urbo; aliaj helpis nin sidiĝi malantaŭ ili sur la grupo de iliaj ĉevaloj, kaj Zoraida rajdis la beston de la onklo de la kristano. La tuta urbo kungregiĝis por nin saluti, ĉar unu el la kavalerianoj antaŭeniĝis al ni kaj informis pri nia alveno. La homoj tute ne surpriziĝis vidante fuĝintajn kaptitojn aŭ maŭrojn kaptitajn: la tieaj ĉeborduloj jam kutimiĝis al tiaj spektakloj, sed mutiĝis de admiro antaŭ Zoraida, kies beleco kulminis tiam kaŭze de la laciga iro kaj de la ĝojo trovi sin sur kristana tero sekure kaj sendanĝere. Tiel ĉarme koloriĝis ŝia vizaĝo pro la diritaj motivoj, ke, se mi ne estus blinda de amo, mi riskas diri, ke ne ekzistis en la mondo pli bela kreitaĵo: almenaŭ, neniam antaŭe mi vidis iun tian.

Ni iris rekte al la kirko por danki Dion pro liaj favoroj kaj, enirinte, Zoraida rimarkis, ke tie troviĝas vizaĝoj similaj al la vizaĝo de Lela Marien. Ni diris al ŝi, ke, efektive, temas pri figuroj ŝiaj, kaj la renegato klarigis al ŝi, kiom li povis, la signifon de tiaj figuroj, por ke ŝi ilin adoru kvazaŭ la propran Lela Marien, kiu fojfoje parolis al ŝi. Zoraida, inteligenta kaj dotita per natura talento, tuj komprenis kion oni diris al ŝi pri la figuroj. Oni kondukis nin de la kirko kaj distribuis nin inter diversaj domoj de la urbo; la nevo de Bustamante gastigis Zoraidan, la renegaton kaj min ĉe siaj gepatroj, kies bonhavo estis sufiĉe granda, kaj kiuj regalis nin kiel sian propran filon.

Ses tagojn ni restis en Vélez Málaga, kaj fine la renegato, informiĝinte pri ĉio al li necesa, vojaĝis al Granada por, pere

de la Sankta Inkvizicio, reveni en la sinon de la sanktega Eklezio; la ceteraj liberigitaj kristanoj foriris dise kien ĉiu preferis. Nur Zoraida kaj mi restis en la urbo, kaj per la eskudoj liveritaj de la ĝentilo de la franco mi aĉetis la beston, kiun ŝi nun rajdas. Servante ŝin ĝis nun kiel patro kaj ŝildisto, ne kiel edzo, mi vojaĝas kun la celo scii, ĉu mia patro vivas ankoraŭ, aŭ ĉu iu el miaj fratoj havis pli bonan sorton ol mi, kvankam, tial, ke la ĉielo faris min kompano de Zoraida, mi ne povas imagi sorton pli dezirindan. Zoraida montras tioman paciencon elportante la ĝenojn proprajn al la mizero kaj tiel elkore volas fariĝi kristanino, ke mi profunde admiras ŝin kaj deziras nur servi ŝin dum la resto de mia vivo. Sed la feliĉon vidi min ŝia, kaj ŝin mia, perturbas kaj difektas la fakto, ke mi ne scias, ĉu mi trovos en mia lando ajnan lokon, kie ŝi povus loĝi, aŭ ĉu la tempo kaj la morto faris tiajn ŝanĝojn en la bonhavo kaj en la vivoj de miaj patro kaj fratoj, ke apenaŭ iu ajn alia povus rekoni min, se ili ne ekzistus.

Nenion plian mi povas aldoni al mia historio, sinjoroj. Juĝu mem, ĉu ĝi estas interesa kaj originala; mi diru nur, ke mi preferintus ĝin rakonti pli lakone, kvankam la timo vin tedi igis min ne mencii kelke da detaloj.

Ĉapitro 42

Pri novaj eventoj en la gastejo kaj pri multaj aliaj aferoj sciindaj

Tion dirinte, la kaptito silentiĝis, kaj don Fernando diris al li:

—Vere, sinjoro kapitano, la maniero rakonti vian kuriozan aventuron estis tiel rimarkinda kiel la originala kaj eksterordinara karaktero de la eventoj mem, plenaj de mirigaj, raraj kaj suspensaj cirkonstancoj. Ni aŭskultis vin kun tiom da plezuro, ke al ni tre plaĉus, se vi denove rakontus vian historion, eĉ se ĝi daŭrus ĝis morgaŭ.

Tuj sekve Cardenio kaj la ceteraj metis sin je lia dispono kun tiel varmaj kaj sinceraj esprimoj, ke la kapitano plene konvinkiĝis pri ilia bonvolo. Precipe don Fernando sin proponis al li, asertante ke, se li volus iri kun li, lia frato la markizo estus la baptopatro de Zoraida, kaj ke li mem, de sia flanko, provizus lin per ĉio necesa, ke li povu montriĝi en sia lando kun la deco kaj rango propraj al lia persono. Ĉion dankis la kaptito plej ĝentile sed akceptis neniun el liaj noblaj proponoj.

Ĉe tio komencis noktiĝi, kaj, kiam jam regis la tenebro, alvenis al la gastejo unu veturilo eskortata de kelkaj rajdantoj surĉevalaj. Ili petis loĝon, sed la gastigantino respondis, ke en la tuta domo troviĝas eĉ ne unu spano neokupita.

—Tamen —diris unu el la eskortantoj— ĉambron oni devas disponigi por lia moŝto la aŭditoro, kiu sidas en la veturilo.

Ĉe tia titolo la gastigantino embarasiĝis kaj diris:

—Sinjoro, la afero estas, ke ni ne disponas litojn; sed se lia moŝto la aŭditoro portas liton kun si, kiel mi supozas, nu, li estu bonvena. Mi kaj mia edzo cedus nian ĉambron, por ke lia moŝto sin aranĝu tie.

—Tre bone —diris la eskortanto.

Ĉe tio jam eliris el la veturilo viro, kies kostumo montris lian oficon: lia longa robo kun krispaj manikoj rivelis lin aŭditoro, kiel lia eskortanto asertis. Li kondukis je la mano pucelon en vojaĝa vesto, proksimume dekksesjaran, tiel belan, allogan kaj gracian, ke ŝi faris profundan impreson al ĉiu, ĝis tia ekstremo, ke se ne troviĝus en la gastejo Dorotea, Luscinda kaj Zoraida, oni pensus preskaŭ neebla la ekziston de komparebla ĉarmulino. Don Quijote ĉeestis la eniron de la aŭditoro kaj la pucelo, kaj diris, tuj kiam li ilin vidis:

—Via moŝto envenu senrezerve kaj regalu vin en ĉi kastelo. Ĉar, kvankam ĝi estas mizera kaj manka de komforto, nenie en la mondo troviĝas loko tiel paŭpera kaj aspra, ke ĝi ne povus cedi ioman spacon al la armoj kaj la letroj, des malpli se ili havas la belecon kiel gvidan kaj ĉefan akompanion, kiel okazas a la letroj de via moŝto flanke de ĉi rava pucelo, antaŭ kies persono, ne nur la kasteloj devas aperti siajn pordojn kaj akcepti ŝin, sed eĉ la rokoj splitiĝi kaj la montoj disfali por lasi ŝin enpaŝi. Via moŝto envenu do en ĉi paradizon, kie troviĝas sunoj kaj steloj por akompani la ĉielon, kiu iras kun vi, kaj kie vi renkontos la armojn en ties plena brilo kaj la belon en ties kulmino.

La aŭditoro miris je la vortoj de don Quijote kaj, atente observante lin, same miris je lia aspekto. Sed, sen scii kion respondi, li denove surpriziĝis antaŭ Zoraida, Dorotea kaj Luscinda, kiuj aliris vidi kaj bonvenigi la pucelon, post ol la gastigantino sciigis ilin pri la alveno de novaj gastoj kaj pri la belo de la junulino. Siaflanke don Fernando, Cardenio kaj

la pastro plej ĝentile sin proponis al la aŭditorio. Vere, lia moŝto estis tute konfuzita kaŭze de ĉio, kion li vidis kaj aŭdis, dum la tri belulinoj de la gastejo salutis la ĉarman pucelon. Baldaŭ li komprenis, ke la homoj tie estas de alta rango, kvankam la figuro, la vizaĝo kaj la teniĝo de don Quijote plene perpleksigis lin. Post la interŝanĝo de ĝentilaĵoj kaj post ol oni ekzamenis la spacon disponeblan en la gastejo, oni ĉion aranĝis kiel antaŭe traktite: ĉiuj virinoj okupus la jam menciitan ĉambregon, kaj la viroj restus ekstere, kvazaŭ garde. La aŭditorio kontentis, ke lia filino —ĉar tio estis la pucelo— loĝus kun la aliaj virinoj. Kaj per la streta lito de la gastejestro kaj per la duono de la lito provizita de la aŭditorio, oni aranĝis sin tiunokte pli bone ol ili pensis.

Nu, okazis, ke, apenaŭ la kaptito vidis unuafoje la aŭditoron, lia koro eksaltis al li en la brusto, ĉar li intuis, ke la alia estas lia frato; li do demandis al unu el liaj servistoj pri la nomo kaj la naskoloko de lia mastro. La servisto respondis, ke la aŭditorio estas la licenciulo Juan Pérez de Viedma, naskiĝinta en vilaĝo de la montoj de León. Ĉi respondo kaj tio, kion li jam vidis, fine konvinkis lin, ke la aŭditorio estas tiu frato lia sekvinta la profesion de la letroj laŭ konsilo de ilia patro. Ekscitita kaj ĝojoplena, la kaptito vokis alflanke al don Fernando, Cardenio, kaj la pastro, rakontis la aferon al ili kaj certigis, ke la aŭditorio estas, vere, lia frato. Antaŭe, la servisto informis lin ankaŭ, ke lia mastro vojaĝas al Indioj por aŭditori ĉe la Supera Tribunalo de Meksikio; ke la pucelo estas lia filino, kies patrino mortis ĉe ŝia naskiĝo, kaj ke li tre riĉiĝis dank' al la doto postlasita, kun la filino, al li. La kaptito petis ilin konsili lin, kiamaniere li konigus sin, aŭ ĉu unue konvenus eltrovi, ĉu lia frato hontiĝus vidante lin malriĉa, aŭ ĉu li akceptus lin elkore.

—Lasu al mi fari ĉi provon —diris la pastro—, kvankam, verdire, ne ekzistas ia motivo por pensi, ke vi ne estos tre

bone akceptita: via frato montras sin bona kaj prudenta, kaj lia konduto ŝajnas indiki, ke li estas nek aroganta nek forgesema, kaj ke li scias ĝuste taksu la ŝanĝojn de la fortuno.

—Tamen —diris la kapitano— mi dezirus konigi min al li ne senpere, sed iel nerekte.

—Mi ripetas al vi —respondis la pastro—, ke mi kondukos la aferon tiel, ke ĉiuj kontentiĝos.

Ĉe tio, jam oni primetis la tablon por vespermanĝi, kaj ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭe, krom la kaptito, kaj krom la damoj, kiuj estis priservitaj en sia ĉambro.

Ĉe la mezo de la manĝo la pastro prenis la parolon:

—En Konstantinopolo, kie mi trapasis kelke da jaroj en kaptiteco, mi havis kamaradon kun via sama nomo, sinjoro aŭditoro: unu el la plej kuraĝaj kapitanoj de la hispana infanterio. Sed li estis tiel missorta kiel brava kaj entreprenema.

—Kiel nomiĝis tiu kapitano, sinjoro? —demandis la aŭditoro.

-Rui Pérez de Viedma —respondis la pastro— kaj naskiĝis en vilaĝo de la montoj de León. Li sciigis al mi tiel kuriozan okazaĵon, en kiu li partoprenis kune kun siaj patro kaj fratoj, ke, se li ne estus tiel verama homo, mi prenintus lian historion kiel unu el la fabeloj rakontataj de oldulinoj vintre ĉirkaŭ la fajro. Li diris, ke lia patro disdividis sian havon inter siaj tri filoj kaj donis al ili konsilojn pli saĝajn ol donus Katono mem. Mia kamarado decidiĝis sekvi la militistan profesion kaj tiel sukcesis, ke post nelonge, dank' al sia kuraĝo kaj energio, gajnis al si la rangon de infanteria kapitano per siaj propraj meritoj kaj iris jam sur la vojo esti promociita kolonelo. Sed la sorto kontraŭis al li, kaj ĝuste

kiam li esperis ĝin pli favora, ĝi forlasis lin: efektive, en la feliĉega tago de la batalo de Lepanto, kie multegaj homoj retrovis sian liberon, li perdis la sian. Mi mem estis kaptita en La-Goleta kaj pro diversaj cirkonstancoj ni trovis nin kamaradoj en Konstantinopolo. De tie li iris al Alĝero, kie li travivis, laŭ mia scio, unu el la plej strangaj aventuroj de ĉi mondo.

La pastro daŭrigis sian rakonton kaj parolis pri tio okazinta al la kapitano kun Zoraida. Ĉion aŭskultis la aŭditorio tiel absorbite, ke neniam antaŭe li estis tiel atenta aŭdanto kiel nun. La pastro plu rakontis la historion ĝis la epizodo, kie la francoj prirabis la kristanojn sur la maro kaj lasis lian kamaradon kaj la belan maŭrinon en la mizero; li aldonis, ke li ne scias kio poste okazis, ĉu ili fine atingis Hispanujon, aŭ ĉu la francoj ilin prenis al Francio.

La kapitano aŭskultis de aparta loko la rakonton de la pastro kaj samtempe observis ĉiun movon de sia frato; ĉi lasta, vidante, ke la pastro alvenis al la fino de sia historio, elpuŝis grandan suspiron kaj diris kun larmoplenaj okuloj:

—Ho, sinjoro, tiel gravas al mi viaj novaĵoj kaj tiel ili min tuŝas, ke mi ne povas ne montri tion per ĉi larmoj, kiuj, spite al mia sinrego kaj diskretemo, fontas el miaj okuloj. La kuraĝa kapitano de vi menciita estas mia plej aĝa frato. Pli forta kaj brava ol mi kaj nia alia plej juna frato, li elektis la dignan kaj honoran karieron de la armoj, t.e., unu el la tri profesioj indikitaj al ni de nia patro, kiel via kamarado diris en sia rakonto tute ne fikcia. Mi iris sur la vojo de la letroj, kie, dank' al Dio kaj al mia diligento, mi leviĝis al mia nuna rango. Mia plej juna frato loĝas en Peruo, kaj tiel riĉas, ke per tio, kion li sendis al mia patro kaj al mi, li ne nur redonis la parton de la kapitalo, kiun li ricevis, sed eĉ liveris al mia patro monon sufiĉan por ke li kontentigu sian naturan prodigemon, kaj ankaŭ helpis min, ke mi povu studi en deca

kaj konvena medio kaj akiri la pozicion, kiun mi nun okupas. Mia patro vivas ankoraŭ, sed mortas de la deziro scii ian novaĵon de sia plej aĝa filo, kaj tage kaj nokte preĝas al Dio, ke la morto ne fermu al li la okulojn sen lasi lin vidi lastafoje sian filon. Sed vere mi miras je tio, ke mia frato, tiel serioza, preteratentis sciigi pri si al sia patro en siaj misfortunoj kaj afliktoj aŭ en siaj tempoj de prospero. Se nia patro, aŭ ni mem, sciintus pri li, li ne bezonus atendi la miraklon de la kano por esti elaĉetita. Sed mi timas nun, ĉar mi ne scias, ĉu la francoj fine liberigis lin aŭ lin mortigis por kovri sian rabon. Kaŭze de tio mi daŭrigos mian vojaĝon, ne kontente, kiel mi ĝin komencis, sed triste kaj melankolie. Ho, bona frato mia! Kiel mi dezirus scii, kie vi troviĝas nun! Mi mem irus liberigi vin de viaj suferoj, eĉ je la kosto suferi mem! Ho, kiu portos al mia patro la novaĵon, ke vi vivas ankoraŭ, kvankam eble en la plej profundaj ublietoj de Berberio? Sed eĉ el tia situacio savus vin la riĉoj de mia patro, de mia frato kaj miaj! Ho, bela kaj grandanima Zoraida, kiel mi feliĉus pagi al vi, se mi povus, la bonon, kiun vi faris al mia frato! Kaj kiel ni ĉiuj ĝojus ĉeestante la renaskiĝon de via animo kaj la celebron de via edziniĝo!

Movata de emocio pro la informoj pri sia frato, la aŭditoro diris ĉi vortojn kaj aliajn similajn tiel kortuŝe, ke ĉiuj esprimis al li sian simpatian. Tamen la pastro, vidante, ke lia ruzo por plenumi la deziron de la kapitano tiel bone sukcesis, ne volis teni plu ilin en aflikto, do li stariĝis de ĉe la tablo, eniris en la alian ĉambron, elkondukis Zoraidan je la mano, kaj ŝin sekvis Luscinda, Dorotea kaj la filino de la aŭditoro. Dume la kapitano atendis kion plian farus la pastro: kaj la pastro faris tion, preni lin je la alia mano, konduki ilin ambaŭ antaŭ la aŭditoro kaj la aliaj kavaliroj, kaj diri:

—Viaj larmoj ĉesu, sinjoro aŭditoro, kaj kroniĝu via deziro per la pleja feliĉo, ĉar jen antaŭ vi staras via bona frato kaj via bona bofratino; ĉi viro estas la kapitano Viedma, kaj ĉi

junulino, la bela maŭrino kiu faris al li tiom da bono. La francoj, kiel mi diris al vi, reduktis ilin al ties nuna stato de senhaveco, por ke via moŝto havu okazon montri al ili la riĉon de via nobla koro.

La kapitano alpaŝis brakumi sian fraton, sed la aŭditorio, metante la manojn sur lia brusto, tenis lin aparte, por observi lin je ioma distanco; kaj kiam li fine rekonis lin, li brakumis tiel varme sian fraton kaj verŝis tiel tenerajn larmojn de feliĉo, ke ankaŭ la pliparto el la ĉeestantoj devis plori. Apenaŭ oni povus imagi, des malpli priskribi, la vortojn interŝanĝitajn inter ambaŭ fratoj, kaj ilian kortuŝan sentelverŝon. Tie, ili koncize informis unu la alian pri la respektivaj travivaĵoj; tie, ili montris la varmon de sia frata amo; tie, la aŭditorio brakumis Zoraidan; tie, li proponis sian bonharon al ŝi; tie, li igis sian filinon brakumi la maŭrinon; tie, la bela kristanino kaj la rava Zoraida denove emociis ĉiujn ĝislarme; tie, don Quijote, atenta kaj muta, meditis pri ĉi eksterordinaraj eventoj kaj atribuis ilin al la ĥimeroj de la vaganta kavalirismo; tie decidiĝis, ke la kapitano kaj Zoraida akompanus la aŭditoron al Sevilla; ke oni informus ilian patron pri la liberigo kaj reveno de la filo, por ke li veturu laŭpove al la dirita urbo kaj ĉeestu la edziniĝon kaj bapton de Zoraida.

La aŭditorio ne povis interrompi sian vojaĝon, ĉar li jam sciiĝis, ke, post unu monato, ekirus el Sevilla ŝiparo al Nova Hispanujo, kaj estus tre nekonvene al li, se li ne enŝipiĝus tiam. Resume, ĉiuj ĝojis je la fortuno de la kapitano; kaj tial, ke jam pasis preskaŭ la du trionoj de la nokto, li decidiĝis retiri sin kaj dormi la ceteron de la nokto. Don Quijote sin proponis stari garde ĉe la kastelo kontraŭ eventuala atako de ajna giganto aŭ senskrupula fripono avida je la granda trezoro da beleco tie sidanta. La konantoj de don Quijote dankis lin kaj sciigis la aŭditoron pri la stranga humoro de la kavaliro, kio multe lin amuzis. Nur Sancho Panza ĉagreniĝis,

ĉar oni enlitiĝis tiel tarde, sed li aranĝis sin pli bone ol la aliaj, kuŝiĝante sur la ŝarĝo-selo de sia azeno, kio kostis al li kare, kiel oni poste vidos. Post ol la damoj sin retiris al sia ĉambro, kaj la aliaj sin akomodis kiom ili povis, don Quijote eliris por gardostari, kiel promesite. Kaj okazis, ke, iom antaŭ la mateniĝo, la damoj ekaŭdis unu voĉon tiel dolĉan kaj harmonian, ke ili ĉiuj komencis atente aŭskulti, speciale Dorotea, kiu, nedormante, kuŝis apud doña Clara de Viedma, la filino de la aŭditoro. Oni ne povis imagi, kiu tiel bele kantis: temis pri unu sola voĉo sen akompano de instrumento, kaj ĝi ŝajnis veni jen de la korto, jen de la stalo. Kaj kiam ili, perpleksaj, aŭskultis atente, Cardenio proksimiĝis al la pordo de la ĉambro kaj diris:

—Se vi, sinjorinoj, ne dormas, aŭskultu: vi aŭdos mulknabon, kies voĉo tiel dolĉas, ke ĝi sorĉas.

—Ni jam aŭskultas ĝin, sinjoro —respondis Dorotea.

Ĉe tio Cardenio foriris, kaj Dorotea, kun plej streĉa atento, kaptis la vortojn de la jena kanzono:

Ĉapitro 43

Kie oni rakontas la plaĉan historion de la mul-knabo
kune kun aliaj strangaj eventoj okazintaj en la
gastejo

Mi navigas en la amo
tra tempestoj kaj profundoj
sed mi perdis jam l' esperon
trafi sur sekuran grundon.

Mi postiras unu stelon
foran, kun pli bona lumo
ol la steloj, kiujn vidis
la piloto Palinuro^[171]

Mi ne scias, kien gvidas
min la stel' kaj en konfuzo
mi ĝin sekvas tre zorgeme
kvankam kiel senzorgulo.

Se mi ĝin plej volas vidi,
tiam tro da ĝena prudo
kaŝas ĝin de la rigardo
kvazaŭ ĉiokovra nuboj.

Ho, brilanta, klara stelo,
min konsumas via brulo!
Se vi forkaŝiĝos iam,
falos mi en mortofundon.

Kiam la kantanto atingis ĉi punkton, ŝajnis al Dorotea, ke
estus bedaŭrinde, se Clara ne -aŭskultus tian voĉon, do
skuetinte ŝin ĝisveke, ŝi diris:

—Pardonu min, kara knabino, ke mi vekas vin, sed mi
deziras, ke vi ĝuu tiun belan voĉon, kian eble vi ne aŭskultis

ĝis nun en via vivo.

Clara vekigis, sed, ankoraŭ duondorma, ne bone komprenis kion ŝi aŭdis, kaj petis Dorotean ripeti siajn vortojn. Dorotea tion faris, kaj tiam Clara komencis aŭskulti; apenaŭ ŝi aŭdis du versojn, kaptis ŝin forta tremado, kvazaŭ ŝi malsanus aŭ suferus seriozan atakon de kvartana febro, kaj ĵetante sin en la brakojn de Dorotea, ŝi diris:

—Ho, tre kara sinjorino! Kial vi vekis min? Plej bone estus nun se la sorto tenus miajn okulojn kaj orelojn fermitaj, tiel, ke mi nek vidus ne aŭdus tiun povran muzikanton.

—Kion vi diras, knabino? Vi scias, ke, laŭdire, la kantanto estas mul-knabo.

—Ne —respondis Clara—. Li senjoras super vilaĝoj, kaj mastras tiel absolute en mia koro, ke, se li ne forlasos ĝin, ĝi ĉiam apartenos al li.

Dorotea miris je la pasiaj vortoj de la knabino, pensis ilin pli maturaj ol oni atendus de ŝia juneco, kaj diris:

—Vi parolas tiamaniere, sinjorino Clara, ke mi ne komprenas vin. Kion signifas tio pri la koro, kaj pri la vilaĝoj kaj pri ĉi muzikanto, kies voĉo tiel perturbas vin? Sed diru nun nenion: mi ne deziras perdi, atentante vian ekzaltiĝon, la plezuron aŭskulti la kantanton, kiu ŝajne komencas denove per novaj vortoj kaj nova melodio.

—Laŭ via plaĉo —respondis Clara, metante al si la manojn sur la orelojn por ne aŭdi lin; ankaŭ je tio miris Dorotea, sed atentis la kanzonon, kiu tekstis jene:

Dolĉa espero mia,
kiu obstaklojn, barojn eldetruas
kaj firme energia

per iluzioj, revoj alkonstruas.
Ne tremu, se vi vidas,
ke ĉiupaŝe vin la mort' insidas.

Pigruloj ne konkeras
honestajn venkojn aŭ triumfojn glorajn,
kaj veas kaj suferas
l' inertaj viroj, kiuj, leporkoraj,
la faton ne oponas
kaj al la pigro mola sin fordonas.

Tre kare kostas amo,
kaj tio estas bona kaj logika,
ĉar riĉas plej balzamo,
se oni opinias ĝin unika;
kaj vere, evidentas,
ke ĉio senvalora nin ne tentas.

L' obstino de amanto
kelkfoje trans la neebleaĵojn vadas,
kaj tial, kun konstanto,
kaj kvankam min muregoj barikadas,
min tenas la espero
ascendi, de ĉi ter', al la ĉielo.

Ĉi tie la voĉo ĉesis, kaj Clara komencis denove plorsingulti, kio ekscitis la deziron de Dorotea koni la kaŭzon de tiel dolĉa kanto kaj de tiel trista ploro, do, ŝi demandis refoje pri la signifo de ŝiaj antaŭaj esprimoj. Tiam Clara, timante ke Luscinda povus aŭdi ŝin, forte alpremis al si Dorotean inter siaj brakoj kaj proksimigis sian buŝon al ŝia orelo, por esti certa, ke ŝi povus paroli, sen ke la aliaj aŭdus.

—Ĉi kantanto, kara sinjorino, estas filo de nobelo de la regno de Aragón, sinjoro de du vilaĝoj, kaj li loĝis fronte al la domo de mia patro en Madrid. Kaj, kvankam mia patro tenis la

fenestrojn kovritaj vintre per kanvasoj kaj somere per ĵaluzioj, mi ne scias, kiel okazis, ke ĉi juna studento vidis min en la kirko aŭ ie ajn; fine li enamiĝis al mi, kion li komprenigis al mi de la fenestro de sia domo per tiom da gestoj kaj larmoj, ke mi devis lin kredi, kaj ankaŭ lin ami, sen scii kiom li amis min. Unu el liaj gestoj konsistis en tio, kunigi la du manojn, kiel signo, ke li edziĝus al mi; kaj, kvankam al mi tre plaĉus la plenumiĝo de lia deziro, ĉar mi estis sola kaj sen patrino, mi ne sciis kun kiu mi devus konsiliĝi; tiel do, mi faris nenion, kaj nur kiam mia patro kaj la lia forestis de siaj respektivaj hejmoj, mi donis al li la solan favoron levi iom la kanvazon aŭ la ĵaluzion kaj lasi min vidi tuta, kio tiel multe lin entuziasmigis, ke li ŝajnis ekster si. Fine alvenis la tempo de la forveturo de mia patro, kaj pri ĝi li sciiĝis, kvankam ne de mi, ĉar mi tute ne povus lin informi. Mi suspektis, ke li malsaniĝis de aflikto, ĉar la tagon de la forveturo mi ne povis vidi lin, por lin adiaŭi eĉ se nur per la okuloj; sed post du tagoj da vojaĝo, kiam mi eniris en vilaĝan gastejon, kiu distancas unu tagon de ĉi tie, mi vidis lin ĉe la pordo, en kostumo de mul-knabo, tiel lerte alivestita, ke mi tute ne rekonintus lin, se mi ne portus lian portreton gravurita en mi koro. Mi lin rekonis, miris kaj ĝojis, li ŝtelrigardis min, nevidate de mia patro, ĉar li kaŝas sin de li, ĉiufoje kiam li aperas antaŭ mi sur la vojo aŭ en la gastejoj, kie ni haltas; kaj tial, ke mi konas lin, kaj konsideras, ke pro amo al mi li iras piede kaj elportas tiom da suferiga penado, min konsumas la aflikto, kaj mi sekvas per la okuloj ĉiun paŝon lian. Mi ne scias, kun kia intenco li venas post mi, kaj kiel li fuĝis de la hejmo de sia patro, kiu profunde lin amas, ĉar li ne havas alian heredonton kaj ĉar la junulo meritas lian amon, kiel vi konstatos, kiam vi vidos lin; krome, kion li kantas, tion li mem kreas en sia kapo, ĉar mi aŭdis, ke li estas granda sciulo kaj poeto. Kaj jen ankoraŭ io: ĉiufoje kiam mi vidas aŭ aŭskultas lin, min kaptas tremo kaj angoro pro timo, ke mia patro povus rekoni lin kaj eltrovi nian korinklinon. Eĉ ne unu vorton mi parolis kun li en la

tuta vivo, tamen mi amas lin tiel multe, ke mi ne povus vivi sen li. Jen ĉio, kara sinjorino, kion mi povas diri pri la muzikanto, kies voĉo, tiel plaĉa al vi, certe sufiĉas por ke vi komprenu, ke li estas, ne mul-knabo, kiel vi asertas, sed mastro de koroj kaj vilaĝoj, kiel mi diris.

—Ne plu parolu, sinjorino Clara —diris Dorotea, kisante mil fojojn la knabinon—. Ne plu parolu, mi petas, kaj atendu la mateniĝon, ĉar mi esperas, kun la helpo de Dio, aranĝi vian aferon, ke ĝi havu feliĉan finon, kiel meritas ĝia honesta komenco.

—Ve al mi, sinjorino! —respondis Clara—. Kian finon atendi, se konsideri, ke lia patro estas tiel riĉa kaj altranga, ke li ne trovus min inda fariĝi la servistino de lia filo, des malpli lia edzino? Cetere mi ne edziniĝus, eĉ por la plej valora de ĉi mondo, sen la scio de mia patro. Mi volus nur, ke ĉi knabo foriru returne kaj lasu min. Eble, se mi ne vidus lin, kaj pro la longo de la vojaĝo, mia nuna aflikto mildiĝus, kvankam, vere, mi konfesas, ke tia rimedo ne multe efikus. Mi ne scias, je la diablo, kiel kreiĝis ĉi situacio, nek kiel penetris en min ĉi amo, kiun mi sentas por li, se konsideri, ke ni ambaŭ tre junas... vere, mi opinias, ke ni havas la saman aĝon; mi ne estas ankoraŭ deksejsjara, nek estos tia, laŭ mia patro, ĝis la venonta tago de Sankta Mikaelo.

Dorotea ne povis ne ridi ĉe la infaneca naivo de doña Clara kaj diris:

—Ripozu, sinjorino, la iometon da nokto laŭŝajne restanta ankoraŭ. Dio alportos al ni la matenon, kaj ĉio iros bone, se mi agos kun sufiĉa lerto.

Ili do denove dormiĝis kaj en la tuta gastejo regis granda silento; nur la filino de la gastejestro kaj Maritornes ne dormis, kaj, sciante la manion de don Quijote, kaj ke li

deĵoras ekstere de la gastejo, armita kaj sur ĉevalo, ambaŭ decidis fari al li ŝercon, aŭ, almenaŭ, iom amuzi sin aŭskultante liajn absurdojn.

Nu, en la tuta gastejo eĉ ne unu fenestro rigardis al la kamparo, sed nur mansarda truo uzata por elŝuti tra ĝi pajlon por la bestoj. La du duonpuceloj venis al ĉi truo kaj rimarkis, ke don Quijote sidas sur la ĉevalo, apogas sin sur la lanco kaj elpuŝas de tempo al tempo dolorajn kaj profundajn suspirojn, kvazaŭ ĉiu el ili forŝirus al li la animon. Samtempe, ili aŭdis lin diri per mola, tenera kaj ama voĉo.

—Ho, kara sinjorino Dulcinea de El Toboso, kulmino de ĉia belo, krono de saĝo, trezoro de gracio, arkivo de virto kaj, resume, modelo de ĉio bona, honesta kaj delica ekzistanta en ĉi mondo! Kion faras nun via gracia moŝto? Ĉu eble vi degnas dediĉi unu penson al via kavaliro kaj sklavo, kiu memvole sin elmetas al tiom da danĝeroj nur por vin servi? Sciigu al mi pri ŝi, ho trivizaĝa lumo!^[172] Eble nun vi ĵaluzas rigardas ŝian belon, dum ŝi promenas en ajna galerio de siaj luksegaj palacoj aŭ, kun la brusto klinita super la balustrado de balkono, ŝi konsideras, kiel ŝi povus, sen danĝero por sia virto kaj noblo, kvietigi la tempeston, kiun pro ŝi suferas mia afliktita koro; eble ŝi pensas per kia gloro ŝi povus kroni mian penadon, per kia balzamo kuraci mian angoron, kaj, fine, kian vivon doni al mia morto, kaj kiel rekompenci min por miaj servoj. Kaj vi, suno, sendube jam preta rapide seli viajn ĉevalojn por frue leviĝi kaj rigardi mian sinjorinon, bonvolu saluti ŝin je mia nomo; sed kiam vi rigardos kaj salutos ŝin, zorgu ne kisi al ŝi la vizaĝon, ke mi ne ĵaluzu kontraŭ vi, pli ol vi ĵaluzis pro la libermora sendankulino,^[173] kiu igis vin ŝviti kaj kuri tra la ebenaĵoj de Tesalio aŭ sur la bordo de la rivero Peneo... nu, mi ne bone memoras, kie vi kuris tiam, ĵaluzas kaj pasia.

Don Quijote atingis ĉi punkton en sia plenda deklamado, kiam la filino de la gastejestro softe vokis lin kaj diris:

—Kara sinjoro, proksimiĝu ĉi tien, bonvolu.

Ĉe tiaj vortoj, don Quijote turnis la kapon kaj vidis, sub la helo de la luno, tiam plenbrila, ke oni vokis lin de la truo, kiu ŝajnis al li fenestro, eĉ provizita per ora krado, propra al tiel riĉa kastelo, kian li imagis la gastejo. Tuj lia freneza fantazio igis lin pensi, ke denove nun, kiel antaŭe, la bela damo, filino de la mastro de la kastelo, venas, urĝate de sia amo, peti lian favoron. Tiel pensante, kaj ne dezirante montri sin malĝentila kaj sendanka, li turnis per la brido Rocinante, proksimiĝis al la truo, vidis la du virinojn kaj diris:

—Mi kompatas vin, bela sinjorino, tial, ke vi fiksas vian aman deziron sur subjekton, kiu ne povas reciproki, kiel meritas via granda ĉarmo kaj nobeleco; sed ne ĵetu la kulpon kontraŭ ĉi povra kavaliro vaganta, pro tio, ke la amo igas lin nekapabla doni sian koron al alia persono ol al la damo, kiu fariĝis absoluta mastrino de lia animo, de la momento kiam liaj okuloj vidis ŝin. Pardonu min, estimata sinjorino, reiru al via ĉambro, kaj ne plu manifestu vian deziron al mi, por ke mi ne ŝajnu ankoraŭ pli sendanka; sed se vi trovas, ke mi povus kontentigi vian amon per io alia ol la amo mem, petu ĝin de mi; kaj mi ĵuras al vi, ke vi tuj ĝin ricevus, eĉ se vi petus de mi tufon da haroj de Meduza, aŭ la sunradiojn mem enfermitajn en fiolo.

—Nenion tian bezonas mia sinjorino, sinjoro kavaliro — respondis Maritornes.

—Kion do, diskreta duenjo, bezonas via sinjorino? — demandis don Quijote.

—Nur unu el viaj belaj manoj —respondis Maritornes—, por ke ŝi kontentigu per ĝi la grandan deziron, kiu puŝis ŝin al ĉi

truo eĉ riske de ŝia honoro, ĉar, se ŝia sinjoro patro tion sciis, li dishakus ŝin kaj la plej granda peco el ŝia korpo estus la orelo.

—Mi volas vidi, ĉu li farus tion —diris don Quijote—. Sed li detenu sin de tia afero, ĉar metinte la manon sur la delikatajn membrojn de sia enamiĝinta filino, li suferus la plej teruran finon iam spertitan de patro en ĉi mondo.

Maritornes ne dubis nun, ke don Quijote donus al ŝi la manon, kiel ŝi petis, kaj, kovinte en sia penso kion fari, ŝi descendis de apud la truo en la stalon, prenis tie la kolŝnuron de la azeno de Sancho kaj rapide revenis al la truo, en la ĝusta momento kiam don Quijote stariĝis sur la selo de Rocinante por atingi la kraditan fenestron, kie, li imagis, atendis la am-sopiranta pucelo. Kaj, donante al ŝi la manon, li diris:

—Prenu, sinjorino, ĉi manon, aŭ pli ĝuste, ĉi ekzekutilon kontraŭ la misfarantoj de ĉi mondo; prenu ĉi manon, mi ripetas, neniam antaŭe tuŝatan de ajna virino, eĉ ne de la absoluta posedantino de mia tuta korpo. Mi ne donas ĝin, ke vi ĝin kisu, sed por ke vi rimarku la strukturon de ĝiaj nervoj, la konsiston de ĝiaj muskoloj, la larĝon kaj grandon de ĝiaj vejnoj; per tio vi povos taksi kiom da forto havas la brako de tia mano.

—Nun ni vidos —diris Maritornes; kaj farinte glitan maŝon per la kolŝnuro, ŝi ĵetis ĝin sur lian pojnon, descendis de la truo kaj forte alligis la alian finon de la ŝnuro al la riglilo de la mansarda pordo. Don Quijote, sentante la aspron de la ŝnuro sur sia pojno, diris:

—Ŝajnas, ke via moŝto raspas al mi la manon, anstataŭ ĝin karesi; ne mistraktu ĝin, ĉar ĝi ne kulpas la mavon, kiun faras al vi la firmo de mia volo, kaj ne ĝustas, ke vi venĝu la

tuton de via ĉagreno kontraŭ tiel eta parto de mia persono. Konsideru, ke, kiu bone amas, ne venĝas sin tiel aĉe.

Sed oni jam ne aŭskultis ĉi vortojn de don Quijote, ĉar tuj kiam Maritornes lin alligis, ambaŭ virinoj, duonmortaj de ridado, foriris kaj lasis lin en tia situacio, ke estis al li tute neeble sin liberigi. Tiel do, kun la brako enpuŝita tra la truo kaj la pojno ŝnurita al la riglilo, li staris sur Rocinante kaj sentis egan timon kaj angoron, pensante, ke, se la ĉevalo paŝus al unu aŭ al alia flanko, li restus pendanta de la brako, do, li ne kuraĝis fari ian movon, kvankam, se konsideri la paciencon kaj la kvieton de la besto, ne ŝajnus strange, se ĝi starus tie senmova dum tuta jarcento. Fine, vidante ke li troviĝas ligita, kaj ke la damoj foriris, don Quijote komencis imagi, ke ĉion ĉi kaŭzis magia arto, kiel la pasintan fojon, kiam la ensorcita maŭro en figuro de mulisto pistis lin en ĉi sama kastelo. Don Quijote malbenis en si sian mankon de saĝo kaj prudento, tial, ke li riskis eniri por la dua fojo en la kastelon, kvankam de tie, antaŭe, li eliris tiel senglore. Li sciis ke, laŭ la reguloj de la vagantaj kavaliroj, kiam ili entreprenas aventuron kaj fiaskas en ties plenumo, tio indikas, ke tia aventuro ne estas destinita al ili, sed al aliaj, do ili ne bezonas provi ĝin duafoje. Tamen, don Quijote tiris sian brakon por vidi, ĉu li povus liberigi sin, sed lia penado vanis, ĉar li troviĝis tre bone ligita. Estas vere, ke li tiris singarde, por ke Rocinante ne moviĝu; kaj, kvankam li deziris sidiĝi sur la selo, li povis nur stari aŭ sin disŝiri de la mano. Tie li forte deziris havi ĉe-mane la glavon de Amadís, imunan al ĉia ensorcĉo; tie li malbenis sian sorton; tie li fantaziis, ke la mondo suferus pro lia foresto dum lia ensorcĉiteco, ĉar li tute ne dubis, ke oni ensorcĉis lin; tie li denove memoris sian karan Dulcinea de El Toboso; tie li vokis sian bonan ŝildiston Sancho Panza, kiu, mergita en profunda dormo kaj kuŝanta sur la ŝarĝo-selo de sia azeno, ne memoris eĉ pri la patrino lin naskinta; tie li alvokis la helpon de la saĝuloj Lirgandeo kaj Alquife kaj de sia bona

amikino Urganda; kaj tie, fine, la mateniĝo trovis lin furioza kaj ekster si, ĉar li opiniis sian ensorĉon eterna, kaj tion plifirmigis la fakto, ke Rocinante eĉ ne ete moviĝis; li kredis, ke li kaj lia ĉevalo devus suferi tian staton, sen manĝi, sen trinki kaj sen dormi, ĝis la misinfluo de la steloj pasus, aŭ ĝis alia pli lerta magiisto rompus la sorĉon.

Sed li tre trompiĝis ĉi-rilate, ĉar apenaŭ komencis tagiĝi, alvenis al la gastejo kvar surĉevalaj viroj tre bele vestitaj kaj ekipitaj, kun siaj pafiloj sur la sel-arkoj. Ili brue frapis la pordon, ankoraŭ fermitan, de la gastejo; kaj kiam don Quijote vidis ilin, li alkriis per aroganta voĉo, en sia funkcio de gardostaranto:

—Kavaliroj, aŭ ŝildistoj, aŭ kio ajn vi estas, vi ne devas tiel frapi la pordon de ĉi kastelo, ĉar oni klare vidas, ke ĉi-hore la enloĝantoj aŭ dormas ankoraŭ, aŭ ne kutimas aperti la fortreson ĝis la suno leviĝas super la tuta lando. Retiru vin, atendu, ke la mateno pli lumiĝos, kaj tiam ni vidos, ĉu konvenos enlasi vin aŭ ne.

—Kio, je la diablo, estas ĉi fortreso aŭ kastelo, ke ni devas observi tiajn ceremoniojn? —diris unu el la rajdantoj—. Se vi estas la gastejestro, ordonu, ke oni apertu la pordon al ni; ni iras survoje kaj deziras nur furaĝon por niaj ĉevaloj kaj plu rajdi, ĉar ni havas urĝon.

—Ĉu al vi ŝajnas, kavaliroj, ke mi aspektas kiel gastejestro? —demandis don Quijote.

—Mi ne scias, kian aspekton vi havas —respondis la alia—, sed mi ja scias ke vi diras stultaĵon, nomante ĉi gastejon kastelo.

—Kastelo ĝi estas, eĉ unu el la plej bonaj de ĉi provinco —asertis don Quijote—, kaj tie interne troviĝas homoj, kiuj portis sceptron en la mano kaj kronon sur la kapo.

—Inverse estus pli amuze: la sceptro sur la kapo kaj la krono en la mano —komentis la vojaĝanto—. Sendube vi volas diri, ke temas pri trupo de aktoroj: ili ofte portas tiajn sceptrojn kaj kronojn. Vere, mi ne kredas, ke homoj indaj je krono kaj sceptro gastus ĉe tiel eta kaj silenta domo.

—Vi apenaŭ konas la aferojn de ĉi mondo, se konsideri, ke vi ne scias pri la eventoj propraj al la vaganta kavalirismo.

La kunuloj de la vojaĝanto, jam senpaciencaj pro lia konversacio kun don Quijote, furioze frapis denove la pordon, tiele, ke la gastejestro, kaj eĉ la ceteraj personoj de la domo, vekigis; la unue nomita levis sin kaj iris demandi, kiu vokas, kaj ĝuste tiam unu el la rajdbestoj de la kvar vojaĝantoj proksimiĝis flari Rocinante, kiu, trista kaj melankolia, kun falantaj oreloj, tenis sur si, sen fari ian movon, la stare streĉitan korpon de sia mastro; finfine, kiel Rocinante estis karna, kvankam ĝi ŝajnis ligna, ĝi ne povis ne reagi, kaj turnis sin por flari de sia flanko la kareseman beston; apenaŭ ĝi moviĝis, la piedoj de don Quijote glitis de sur la selo, kaj li falus teren, se li ne restus pendanta de la brako; tio kaŭzis al li intensegan doloron, kaj li kredis, ke oni fortranĉis lian pojnon, aŭ ke lia brako elŝiriĝis, ĉar li pendis tiel proksime al la grundo, ke li tuŝetis ĝin per la pintoj de la piedoj; sed tiamaniere lia angoro eĉ pli kreskis, ĉar, sentante kiom ete distancis liaj plandoj de la tero, li streĉis sin, baraktante por ĝin pli bone atingi; fakte li ŝajnis suferi la torturon de la strapado,^[174] kie la viktimo, kontakte-nekontakte kun la planko, pliintensigas sian doloron despere streĉante sin, trompita de la espero ke, tiamaniere, li fine povos bone stari.

[171] Ĉefpiloto de la ŝiparo de Eneo, en la *Eneado* de Vergilio.

[172] Aludo al la luno al ties diversaj fazoj.

[173] Dafna, persekutata de Apolono, laŭ la greka mitologio.

[174] Neologismo. Hispane «estrapada»; france «estrapade». lama torturilo: Oni levis ĝis la supra parto de ligna stango krimulon kun la manoj kunligitaj per ŝnuro, de kiu samtempe pendis lia korpo. Per pulio oni rapidege faligis la viktimon ĝis tre proksime al la planko, kio kaŭzis la luksacion de ĉiuj liaj membroj, speciale de la ŝultroj kaj brakoj.

Ĉapitro 44

Daŭrigo de la eksterordinaraj aventuroj en la gastejo

Fine, don Quijote kriis tiel laŭte, ke la gastejestro, terurita, subite apertis la pordon kaj eliris vidi, de kie venas tiaj muĝoj; dume, ankaŭ la kvar vojaĝantoj proksimiĝis al nia hidalgo. Maritornes, jam vekita de la samaj voĉoj, kaj ĝuste divenante la kaŭzon de la alarmo, surpriris al la mansardo, nerimarkate deligis la ŝnuron de kiu pendis don Quijote, kaj la kavaliro tuj sekve falis teren antaŭ la gastejestro kaj la vojaĝantoj; ili rapidis al li, kaj demandis lin pri la motivo de liaj krioj. Sen respondi eĉ unu vorton, don Quijote detiris la ŝnuron de sia pojno, stariĝis, saltis sur Rocinante, fiksas la ŝildon al la brako, metis la lancon en horizontalan pozicion, iom distanciĝis kaj revenis duongalope, dirante:

—Se iu ajn asertas, ke oni min prave ensorcis, mi respondas, ke li mensogas; kaj se mia sinjorino, la princino Micomicona, donos al mi permeson, mi defios lin al duela batalo.

La ĵusvenintoj miris ĉe la vortoj de don Quijote, sed la gastejestro metis finon al ilia surprizo, kiam li klarigis, kiu estas la hidalgo, kaj ke oni ne devus atenti lin, pro la misfunkciado de lia kapo. Ili demandis al la mastro, ĉu knabo proksimume dekkvinjara kaj en kostumo de muelisto ne venis al la gastejo, kaj ili faris priskribon de lia persono akordan kun la aspekto de la amanto de doña Clara. La mastro respondis, ke tiom da homoj gastas ĉe li, ke li ne rimarkis la priskribiton; sed unu el la kvar vidis la veturilon de la aŭditoro kaj diris:

—Sendube la knabo estas ĉi tie, ĉar jen la veturilo, kiun ŝajne li sekvas; unu staru ĉe la pordo, kaj la ceteraj eniru

serĉi lin; kaj eĉ pli bone se unu el ni rondirus la domon, ke li ne forkuru saltante la muron de la kralo.

—Tion ni faros —respondis alia.

Du eniris, unu restis ĉe la pordo, alia komencis ĉirkaŭi la gastejon; ĉion ĉi rimarkis la mastro kaj ne bone komprenis la kialon de iliaj movoj, kvankam li suspektis, ke ili serĉas la knabon, kies priskribon ili antaŭe faris al li. Ĉe tio, jam plene helis la tago, kaj tial, kaj ankaŭ kaŭze de la bruado de don Quijote, ĉiuj estis vekitaj kaj komencis ellitiĝi, precipe doña Clara kaj Dorotea; la unua pro ekscito, ĉar ŝia amanto troviĝis tiel proksima, kaj la alia pro la deziro vidi lin, apenaŭ dormis tra la nokto.

Don Quijote, vidante, ke la kvar vojaĝantoj tute ignoras lin kaj ne respondas lian demandon preskaŭ eksplodis de kolero kaj furiozo: kaj se li trovintus en la kavalirisma kodo, ke vaganta kavaliro povus lice plenumi alian taskon malgraŭ sia parolo fini unue entreprenon antaŭe promesitan, certe li atakus la tutan grupon kaj devigus ilin respondi al lia demando; sed, ĉar ŝajnis al li, ke ne decus, nek konvenus komenci alian taskon ĝis li surtronigus Micomiconan, li decidis teni la buŝon fermita, regi sin, kaj atendi la rezulton de la serĉado de la vojaĝantoj; fine unu el ili trovis la junulon dormanta apud mul-knabo, kaj certe ne imaganta, ke oni lin serĉus, kaj eĉ malpli, ke oni trovus lin. La viro prenis lin je la brako kaj diris:

—Vere, sinjoro don Luis, via kostumo tre kongruas kun via rango, kaj la lito, kie vi kuŝas, bele respondas al la lukso en kiu via patrino vin edukis.

La knabo frotis al si la dormemajn okulojn, rigardis ioman tempon sian kaptinton, kaj, fine rekonante lin kiel serviston

de sia patro, li tiel surpriziĝis, ke li ne kapablis balbuti eĉ unu vorton. La servisto aldonis:

—Sinjoro don Luis, nenio alia farendas ol pacienci kaj returne iri hejmen, se via moŝto ne volas, ke nia senjoro, via patro, vojaĝu al la transa mondo; ĉar tia sorto atendas lin, se konsideri, kiel multe afliktas lin via foresto.

—Nu, kiel sciis mia patro, ke mi venis ĉi-voje kaj en ĉi kostumo? —demandis don Luis.

—Vi konfidis vian intencon al iu studento amiko via, sed li tiel kortuŝiĝis ĉe la doloro, kiun via foresto kaŭzas al via patro, ke li fine rivelis al li vian projekton. Tiam via patro sendis kvar servistojn serĉi vin, kaj jen, ni estas ĉi tie je via dispono, nedireble kontentaj pro la bona rezulto de niaj klopodoj, kaj pro tio, ke ni revenos kaj metos vin antaŭ la okuloj de via amanta patro.

—Okazos, kiel mi deziras, aŭ kiel la ĉielo ordonos — respondis don Luis.

—Kion vi povas deziri, aŭ la ĉielo ordoni, se ne tion, ke vi konsentu reveni kun ni? Alio ne eblas.

Aŭskultinte ĉi dialogon, la mul-knabo kuŝanta apud don Luis leviĝis kaj iris rakonti la aferon al don Fernando, Cardenio kaj la ceteraj, kiuj jam estis vestitaj. Li menciis, ke la viro sin turnis al la junulo titolante lin «don»; poste, la mulisto aldonis, ke li aŭdis ilian konversacion, ke la viro petis la junulon reveni hejmen, kaj ke ĉi lasta ne volis obei. Tiaj novaĵoj, kune kun ilia scio pri la bela voĉo donacita de la ĉielo al la junulo, kreskigis ĉe ili la deziron koni lin pli detale, kaj eĉ helpi lin, se oni iel volus lin perforti. Tiel do, don Fernando kaj la ceteraj sin direktis al la loko, kie la knabo diskutis ankoraŭ kun la servisto.

Ĉi-momente Dorotea eliris el sia ĉambro, kaj doña Clara, profunde agitata, sekvis ŝin; Dorotea vokis Cardenion alflanke kaj rakontis al li, per kelkaj resumaj vortoj, la historion de la muzikanto kaj doña Clara. De sia flanko Cardenio informis ŝin pri la trovo de don Luis fare de liaj servistoj, sed, ĉar li ne parolis sufiĉe softe, doña Clara, aŭdante lin, ricevis tian ŝokon, ke, se Dorotea ne subtenus ŝin, ŝi falus sur teron. Cardenio diris al Dorotea, ke ŝi revenu kun la knabino al la ĉambro, kaj ke li farus ĉion eblan por aranĝi la aferon. Ambaŭ virinoj, do, eniris denove.

Ĉe tio la kvar sekvintoj de don Luis estis jam interne de la gastejo kaj ĉirkaŭis lin, urĝante lin reveni tuj hejmen por konsoli sian patron. Li respondis, ke tion li ne farus, ĝis li plenumus ion, de kio dependis lia vivo, lia honoro kaj lia animo. Tiam la servistoj insistis pli energie, dirante, ke sub nenijaj cirkonstancoj ili revenus sen li, kaj ke ili prenu lin kun si, ĉu li volus, ĉu ne.

—Tion vi faros —respondis don Luis— nur se vi portos min morta; kvankam kiel ajn vi kondukus min, mi irus senviva.

La pli granda parto de la gastoj jam proksimiĝis aŭskulti la diskutantojn, precipe Cardenio, don Fernando, ties kompanoj, la aŭditoro, la pastro, la barbiro kaj don Quijote, kiu pensis, ke oni ne plu bezonis gardi la kastelon. Cardenio, kiel konanto de la historio de la knabo, demandis al la servistoj, kian motivon ili havas por preni lin kun si kontraŭ lia volo.

—Nia motivo —respondis unu el la kvar— estas servi lian patron, ĉar la foresto de ĉi sinjoro metas lin en danĝero de morto.

—Ne rakontu ĉi tie pri miaj aferoj —rebatis don Luis—. Mi estas libera homo, kaj nur propravole mi revenus; se ne,

neniu el vi povus devigi min.

—Vin devigos via propra prudento —diris la viro—, sed, se ĝi ne sufiĉus, ni estas ja sufiĉaj por plenumi la ordonon ricevitan kaj por fari nian devon.

—Nu, ni vidu, kio estas la esenco de ĉi afero —interrompis la aŭditorio.

La viro, kiu rekonis en li la najbaron de sia mastro, respondis:

—Ĉu via moŝto, sinjoro aŭditorio, ne konas ĉi kavaliron? Li estas la filo de via najbaro kaj forlasis sian hejmon en ĉi kostumo tute nedeca al lia rango, kiel vi povas vidi.

Tiam la aŭditorio rigardis pli atente la junulon, lin rekonis, kaj diris, brakumante lin:

—Pri kia infanaĵo temas, don Luis? Kian gravan motivon povus movi vin vojaĝi ĉi-maniere kaj en kostumo tiel ofenda al via rango?

Larmoj aperis en la okuloj de la knabo, kaj li ne sciis kion respondi al la aŭditorio; ĉi lasta diris al la kvar servistoj, ke ili trankviliĝu, ke ĉio iros bone; poste li prenis la manon de la knabo, kondukis lin flanken kaj demandis al li pri la motivoj de lia konduto.

Sed, dum la aŭditorio faris al li ĉi demandon kaj aliajn, aŭdiĝis laŭtegaj voĉoj ĉe la pordo de la gastejo: okazis, ke du viroj, pasiginte tie la nokton, kaj vidante, ke ĉiuj okupas sin nur pri la afero de la kvar servistoj, provis foriri sen pagi; sed la mastro, pli atenta al la propraj aferoj, ol al la fremdaj, kaptis ilin ĉe la pordo, petis ilin kvitiĝi kaj riproĉis ilian friponaĵon per tiel krudaj vortoj, ke la du viroj indigniĝis ĝis la ekstremo respondi per la pugnoj; kaj tiel fervore ili

komencis tani al li la haŭton, ke la kompatinda mastro devis krei kaj peti helpon.

Liaj edzino kaj filino rimarkis, ke ĉiuj, krom don Quijote, ŝajnas tro okupataj por helpi la mastron, do lia filino kriis al nia hidalgo:

—Via moŝto, sinjoro kavaliro, helpu per via granda kuraĝo mian povran patron, kiun du fiuloj draŝas kvazaŭ grenon!

Al tio don Quijote respondis lante kaj flegme:

—Via peticio, bela pucelo, ne estos nun traktita, ĉar ne licas, ke mi miksu min en ajnan aventuron, ĝis okazos la sukcesa fino de la entrepreno, al kies plenumo mi min devigis. Sed, por servi vin, ni povus fari la jenon: kuru diri al via patro, ke li eltenu en la batalo, kiom li povas, kaj ke sub nenia preteksto li devas lasi sin venki; dume, mi petos de la princino Micomicona permeson por helpi lin en ties danĝera situacio, kaj estu certa, ke, se ŝi konsentos la peton, mi eliros lin el ĝi.

—Tiel certe, kiel mi estas pekantino —diris Maritornes, kiu troviĝis tie—, oni ekspedos mian mastron al la alia mondo, antaŭ ol vi ricevos tian permeson.

—Atendu nur, sinjorino, ke mi havigu al mi la diritan permeson —respondis don Quijote—, kaj ne gravos, ĉu li sidos en la alia mondo, ĉar mi elprenos lin el tie, eĉ se la tuta tiam mondo oponos; aŭ almenaŭ, mi venĝos vin tiel terure kontraŭ kiuj sendis lin tien, ke vi sentos vin pli ol sufiĉe kontentaj.

Senplie don Quijote genuiĝis antaŭ Dorotea, kaj petis de ŝi per kavalireskaj kaj romaneskaj esprimoj, ke ŝia moŝto bonvolu permesi lin helpi kaj defendi la kastelmastron, kiu troviĝas en grava danĝero. La princino donis volonte sian

konsenton, kaj don Quijote rapide fiksas la ŝildon al la brako, prenis la glavon kaj kuris al la pordo, kie la du gastoj ankoraŭ regalis entuziasme la mastron; sed, tuj kiam li alvenis, li hezitis kaj staris senmova, kvankam Maritornes kaj la gastejestrino demandis lin, kial li haltas, anstataŭ helpi ilian sinjoron kaj edzon.

—Mi detenas min —respondis don Quijote— ĉar ne licas, ke mi uzu mian glavon kontraŭ senrangaj personoj. Voku ĉi tien mian ŝildiston Sancho, tial, ke ĉi defendo kaj venĝo propre lin koncernas.

Ĉi sceno havis lokon ĉe la pordo de la gastejo, kaj dume ne ĉesis la pluvo de pugnobatoj, kies pliparto falis sur la mastron, provokante la koleron de Maritornes, lia edzino kaj lia filino, jam desperaj vidi la timemon de don Quijote, kaj la mavan momenton elportatan de ilia mastro, edzo kaj patro.

Sed ni lasu lin tie, ĉar certe li ricevos ies helpon; kaj, se ne, li suferu en silento pro sia manko de prudento voli ampleksi pli ol liaj fortoj permesas; kaj ni iru returne kvindek paŝojn por scii kion don Luis respondis al la aŭditoro, kiam ĉi lasta demandis al la knabo pri lia motivo vojaĝi piede kaj en tiel nedeca kostumo.

Kiel signo de la profunda aflikto torturanta lian koron, don Luis forte premis al li la manojn kaj respondis verŝante multe da larmoj:

—Sinjoro, mi povas diri al vi nur, ke, de la momento kiam la ĉielo disponis (kaj la fakto, ke ni estas najbaroj, faciligis), ke mi vidu vian filinon, kaj mian sinjorinon doña Clara, mi faris ŝin mastrino de mia koro; kaj se vi, mia vera sinjoro kaj patro, ne oponas, hodiaŭ mem ŝi estos mia edzino. Pro ŝi mi forlasis la patran hejmon, kaj pro ŝi mi alivestis min per ĉi kostumo, por sekvi ŝin kien ajn ŝi iras, kiel sago al celo, kaj

kiel ŝipano al nordo. Pri mia pasio ŝi konas nur kion miaj larmoj povis kelkfoje montri al ŝi defore. Vi jam scias, sinjoro, pri la riĉo kaj nobeleco de mia patro, kaj pri tio, ke mi estas lia unika heredonto. Se ĉi cirkonstancoj ŝajnas al vi sufiĉe bonaj, por ke vi faru al mi la plejan bonon, jam nun akceptu min kiel vian filon; kaj kvankam mia patro, movata de aliaj projektoj, ne aprobus la bonon, kiun mi sciis trovi, tamen la tempo havas pli da forto por detrui kaj ŝanĝi la aferojn, ol la volo de la homoj.

Ĉe tio la enamiĝinta knabo silentiĝis, kaj la aŭditorio sentis sin tiom plena de miro, ĉar don Luis tiel delikate rivelis sian senton, kiom konfuzita kaj perpleksa, ĉar li ne sciis, kian decidon alpreni en tiel subita kaj neatendita situacio. La aŭditorio, do, respondis nur, ke la junulo devus teni sin trankvila kaj iel aranĝi, ke la servistoj ne revenu hejmen kun li tiun tagon; tiel, li havus tempon sufiĉan por trovi la solvon plej konvenan al ĉiu. Don Luis perforte kisis al li la manojn, kaj eĉ banis ilin per larmoj kapablaj moligi ŝtonan koron, des pli la koron de la aŭditorio, kiu bone komprenis, ke tia edziĝo estus tre avantaĝa por lia filino, kvankam li volus, ke, se eble, ĝi okazu kun la aprobo de la patro de don Luis; krome la aŭditorio sciis, ke li klopodas atingi por sia filo la titolon de markizo aŭ grafo.

Dume, la gastoj jam paciĝis kun la mastro, ĉar pro la bonaj argumentoj kaj konsiloj de don Quijote, pli ol pro liaj minacoj, ili pagis sian tutan ŝuldon; de sia flanko la servistoj de don Luis atendis la finon de lia konversacio kun la aŭditorio kaj lian decidiĝon. Sed la diablo, ĉiam sendorma, ordonis en ĉi momento la eniron en la gastejon de la sama barbiro, kies kaskon de Mambrino iam prenis don Quijote de li, dum Sancho ŝanĝis la harnison de lia azeno por la harniso de la sia. La dirita barbiro, kondukante sian beston al la stalo, vidis, ke Sancho flikas ian parton de la ŝarĝo-selo, ĝin rekonis kaj senplie impetis kontraŭ la ŝildisto, dirante:

—Mi havas vin, don latrono! Redonu la barbo-pelvon, la ŝarĝo-selon kaj la harnison, kiujn vi rabis de mi!

Vidante sin tiel neatendite atakata, kaj aŭdante tiom da insultoj kontraŭ sia persono, Sancho prenis la selon per unu mano, kaj per la alia donis tian pugnobaton al la agresanto, ke ties makzeloj baniĝis en sango. Sed la barbiro, same alkroĉinta sin al la selo, plu alteniĝis al ĝi, malgraŭ la bato, kaj eĉ levis la voĉon, ĝis tia ekstremo, ke ĉiuj elkuris el la gastejo al la loko de la brua disputo.

—Helpon, je la nomo de la reĝo kaj de la justico! —kriis la barbiro—. Ĉi latrono ne nur prirabis min, sed volas ankaŭ mortigi min!

—Vi mensogas —respondis Sancho—; latrono mi ne estas. Mia sinjoro don Quijote liche gajnis ĉi predon en ĝusta batalo.

Don Quijote spektis la scenon, tre ĝojis, vidante sian ŝildiston ataki kaj defendi sin bonege, opiniis lin kuraĝa homo kaj decidis en si armi lin kavaliro en la unua konvena okazo, ĉar ŝajnis al li, ke Sancho estus inda membro de la kavalira ordeno. La barbiro diris interalie laŭlonge de la disputo:

—Sinjoroj, ĉi ŝarĝo-selo tiel apartenas al mi, kiel mia vivo apartenas al Dio. Mi ĝin konas, kvazaŭ mi estus ĝin naskinta. Cetere, mia azeno troviĝas en la stalo, kaj ĝi pruvos, ke mi ne mensogas. Oni surmetu al la besto la selon, kaj se ĝi ne sidos perfekte, oni pendumu min! Sed jen ankoraŭ io: la saman tagon, kiam ili rabis la selon, ili krome forprenis de mi ne uzatan barbo-pelvon ladan, kiu valoris unu eskudon.

Ĉe tio don Quijote ne povis ne respondi; li puŝis sin inter ambaŭ disputantoj, apartigis ilin, metis la selon sur la teron, ke ĝi troviĝu antaŭ ĉies okuloj ĝis la solvo de la afero, kaj diris:

—Kavaliroj, vi povas klare kaj evidente vidi, ke ĉi bonulo eraras, kiam li donas la nomon de barbo-pelvo al io, kio estis, estas kaj estos la helmo de Mambrino; mi prenis ĝin de li en ĝusta batalo kaj ĝin posedas leĝe kaj rajte. La afero de la selo ne koncernas min: ĉi-rilate mi diru nur, ke mia ŝildisto Sancho petis de mi permeson preni de ĉi venkita kovardo la harnison de ties ĉevalo por garni per ĝi sian propran beston. Mi donis la permeson, li prenis la harnison, kaj se ĝi transformiĝis en ŝarĝo-selon, la sola klarigo estas, ke tiaj metamorfozoj ordinare okazas en la kavaliraj aferoj. Konfirme de tio, rapidu, mia kara Sancho, kaj portu ĉi tien la helmon, kiun ĉi bonulo nomas barbo-pelvo.

—Je Dio, sinjoro —respondis Sancho—. Se ni ne povas prezenti alian pli bonan ateston por defendi nian aferon, sciu, ke la kasko de Mambrino tiom similas al pelvo, kiom la harniso de ĉi bonulo al ŝarĝo-selo.

—Faru kion mi ordonas —diris don Quijote—, ĉar en ĉi kastelo ne ĉio povas esti sub ensorĉo.

Sancho iris preni la pelvon, revenis kun ĝi, kaj don Quijote, tuj kiam li ĝin vidis, ekkaptis ĝin, dirante:

—Rimarku, viaj moŝtoj, ĉu ĉi viro ne senhonte asertas, ke ĉi peco estas pelvo, kaj ne helmo, kiel mi diras; kaj mi ĵuras, je mia ordeno kavalira, ke mi prenis de li ĉi saman helmon kaj ke mi ne faris al ĝi ajnan aldonon aŭ deprenon.

—Tute certe! —diris Sancho—, ĉar, de kiam mia sinjoro ĝin gajnis, li uzis ĝin nur en la batalo por la liberigo de la povraj katenitoj; kaj dank' al ĉi pelvo-kasko, li povis eltiri sin ne mave el la lukto, malgraŭ la multaj ŝtonbatoj ricevitaĵ.

Ĉapitro 45

Kie fine klariĝas la afero pri la helmo de Mambrino kaj la ŝarĝo-selo, kun aliaj aventuroj certe okazintaj

—Kion opinias viaj moŝtoj pri la asertoj de ĉi ĝentilhomoj? — demandis la barbiro—. Ili eĉ ĵuras, ke ĉi peco estas, ne barbo-pelvo, sed kasko.

—Kaj se iu dirus la malon —intervenis don Quijote—, mi respondus al li, se li estus kavaliro, ke li mensogas, kaj, se ŝildisto, ke li remensogas milfoje.

Dume majstro Nicolás, nia barbiro, atente sekvis la konversacion kaj, ĉar li tre bone konis la naturon de don Quijote, ekhavis la ideon stimuli lian frenezon kaj amuzi la grupon, antaŭenpuŝante la aferon en ŝercon; do, li turnis sin al la alia barbiro kaj diris:

—Sinjoro barbiro, aŭ kio ajn vi estas, sciu, ke ankaŭ mi havas vian saman profesion, kaj jam de pli ol dudek jaroj posedas la koncernan diplomon; sekve mi konas tre bone ĉiun ilon de la barbir-arto, sen ia escepto; krome, jun-aĝe mi soldatis, do scias ankaŭ kio estas helmo, kaj moriono,^[175] kaj kasko fermita kaj la ceteraj objektoj de la armeo, t.e. de la armiloj de la soldatoj; kaj mi asertas (kvankam mi volonte alprenus pli ĝustan juĝon, se oni ĝin deklarus) ke la peco subtenata de ĉi bonulo ne nur ne estas barbo-pelvo, sed tiel diferencas de ĝi, kiel nigro de blanko kaj vero de mensogo; mi asertas ankaŭ, ke temas ja pri helmo, sed ne pri kompleta helmo.

—Vi pravas —diris don Quijote—, ĉar mankas al ĝi la duono, t.e. la makzelpeco.

—Efektive —aldonis la pastro, kiu divenis la intencon de majstro Nicolás.

Cardenio, don Fernando kaj ties kompanoj esprimis la saman opinion, kaj eĉ la aŭditorio mem sendube partoprenus en la ŝerco, se lin ne absorbus la afero de don Luis; sed la serioza objekto de liaj pensoj tiel altrudiĝis al li, ke li apenaŭ atentis la disvolvon de la farso.

—Je Dio! —diris la priŝercata barbiro—. Ĉu eblas, ke tiom da honorindaj kavaliroj ripetas, ke ĉi tio estas, ne pelvo, sed kasko? Ajna universitato, eĉ plej klera, mirus je tia opinio. Nu, bone, se la pelvo estas kasko, tiam la ŝarĝo-selo devas esti ĉevala harniso, kiel ĉi kavaliro diras.

—Ĝi ŝajnas al mi ŝarĝo-selo —diris don Quijote— sed, kiel mi jam antaŭe deklaris, mi ne miksas min en tion.

—Tamen —intervenis la pastro— sinjoro don Quijote devus diri al ni, ĉu temas pri selo aŭ harniso, ĉar mi kaj ĉi sinjoroj rekonas lian superecon en la aferoj de la kavalirismo.

—Je Dio, karaj sinjoroj —respondis don Quijote—. Tiel multaj kaj diversaj strangaĵoj okazis al mi en ĉi kastelo, en la du fojoj en kiuj mi loĝis en ĝi, ke mi ne kuraĝus doni asertan respondon al ajna demando pri ĝiaj aferoj, ĉar mi pensas, ke ĉio ĉi tie okazas per ensorĉo. La unuan fojon multe molestis min ensorĉita maŭro loĝanta en la kastelo, kaj al Sancho ne estis tre bone inter la manoj de kelkaj subuloj liaj; kaj hieraŭ nokte mi pendis de ĉi brako preskaŭ du horojn, sen scii kial aŭ kiel trafis min tia misfortuno. Tiel do, doni mian opinion pri tiel konfuza afero egalus fari tre senpripensan juĝon. Rilate tion, ĉu ĉi peco estas helmo aŭ pelvo, mi jam respondis; sed mi ne kuraĝas definitive decidi, ĉu ĉi alia peco estas ŝarĝo-selo aŭ harniso, do, sinjoroj, mi lasas la aferon al via bona kriterio: tial, ke vi ne apartenas al la

kavalira ordeno, kiel mi, eble la ĉi-lokaj ensorĉoj ne efikas sur vin, kaj sekve vi havas la menson libera por vidi la aferojn de ĉi kastelo tiaj, kiaj ili estas, kaj ne kiaj ili ŝajnas al mi.

—Nedubeble, don Quijote saĝe argumentis, ke al ni tuŝas decidi ĉi aferon —diris don Fernando—. Kaj, por juĝi sur solida bazo, mi petos la sekretan voĉon de ĉiu kavaliro kaj sciigos al vi la veran rezulton de la voĉdonado.

Ĉio ĉi kaŭzis egan amuzon al la konantoj de la naturo de don Quijote, sed ŝajnis la pleja absurdo de la mondo al la ceteraj personoj, precipe al la kvar servistoj de don Luis, al don Luis mem, kaj al du tri vojaĝantoj ĵusvenintaj kun aspekto de taĉmentanoj de la Santa Hermandad, kio efektive ili estis.

Sed plej multe perpleksis la barbiro, kies pelvo transformiĝis en kaskon de Mambrino antaŭ liaj propraj okuloj, kaj kies ŝarĝo-selo, kiel sendube li pensis, ŝanĝiĝus al pompa harniso de ĉevalo; kaj unuj kaj aliaj ridis, kiam don Fernando parolis al la orelo de ĉiu, por ke li sekrete deklaru, ĉu la belaĵo objekto de tiaj diskutoj estas selo aŭ harniso. Fine, preninte nur la voĉojn de la konantoj de nia hidalgo, li diris laŭte:

—Okazas, bona barbiro, ke mi laciĝas demandi, ĉar ĉiu respondas, ke ridindus diri, ke ĉi peco estas ŝarĝo-selo de azeno, kiam efektive temas pri harniso de ĉevalo, eĉ de ĉevalo de pura raso. Do, vi devas pacienci, ĉar, spite al vi kaj al via azeno, ĉi tio estas harniso kaj ne selo; vi aĉe defendis vian aferon, kaj viaj pruvoj ne taŭgas.

—Neniam mi sidu en la ĉielo, se viaj moŝtoj ne trompiĝas! —ekkriis la povra barbiro—. Kaj mia animo prezentiĝu antaŭ Dio, tiel certe, kiel certe ĉi tio estas selo kaj ne harniso! Sed,

tien iras leĝoj...^[176] kaj punkto. Cetere, mi ne estas ebria: eĉ ne matenmanĝis ankoraŭ.

La naivo de la barbiro provokis ne malpli da rido ol la absurdoj de don Quijote, kiu rimarkis ĉi-momente:

—Nenio plu farendas ĉi tie: nur, ke ĉiu reprenu sian proprajon. Kaj, kion donas Dio, tion benu Sankta Petro.^[177]

Sed unu el la kvar servistoj de don Luis diris:

—Se ne temas pri ia aranĝita ŝerco, mi ne povas kompreni, ke viroj kiuj posedas, aŭ ŝajnas posedi, bonan inteligenton, kuraĝas diri kaj aserti, ke ĉi objektoj ne estas pelvo kaj ŝarĝo-selo; sed, ĉar vi insistas, mi pensas do, ke ia mistero kaŝiĝas en la fakto obstine defendi ion rekte kontraŭan al la vero kaj eĉ al la logiko; kaj mi ĵuras je... —kaj ĉi tie li diris vortaĉon—, ke ĉi tio estas pelvo de barbiro kaj la alio ŝarĝo-selo de azeno, eĉ se la tuta mondo asertas la malon.

—Povus temi pri selo de azenino —diris la pastro.

—Ĉu ne la sama afero? —respondis la servisto—. La diskuto temas, ne pri tio, sed pri la punkto, ĉu ĉi peco estas ŝarĝo-selo aŭ ne.

Unu el la taĉmentanoj ĵus alvenintaj aŭskultis la diskuton, kaj apogis la argumentojn de la servisto, dirante plena de kolero kaj furiozo:

—Tiel certe ĝi estas selo, kiel certe mi estas filo de mia patro. Kiu diris aŭ diras alion, sendube ebrias kiel uvo.

—Vi mensogas, fripono senhonora! —respondis don Quijote. Kaj, levante la lancon, kiu li ĉiam tenis en la mano, li aldirektis tielan baton sur lian kapon, ke se la taĉmentano ne devius, nia hidalgo sternus lin surteren. La lanco

dissplitiĝis kontraŭ la grundo, kaj aliaj taĉmentanoj, vidante, ke oni mistraktas tiamaniere lian kamaradon, laŭte kriis petante helpon por la Santa Hermandad. La gastejestro, kiu apartenis al ĉi institucio, rapide eniris preni sian ordonbastonon kaj sian glavon kaj revenis meti sin ĉe la flanko de siaj kunuloj; la servistoj de don Luis ĉirkaŭis lin, ke li ne fuĝu en la tumulto; la barbiro, vidante la tutan domon en tia pandemonio, denove ekprenis sian ŝarĝo-selon, kaj la samon faris Sancho; don Quijote eltiris la glavon kaj alsaltis kontraŭ la taĉmentanoj; don Luis laŭtis al siaj servistoj, ke ili lasu lin kaj kuru helpi la hidalgon, Cardenion kaj don Fernandon, kiuj du lastaj staris ĉe la flanko de don Quijote; la pastro stentoris; la gastejestrino kriis; ŝia filino lamentis; Maritornes ploris; Dorotea staris konsternita; Luscinda, agitata; doña Clara svenis. La barbiro batis Sanchon; Sancho muelis la barbiron; unu servisto kuraĝis ekpreni don Luis je la brako, ke li ne eskapu, sed la junulo per fortega pugnobato banis en sangon lian makzelon; la aŭditoro defendis don Luis; don Fernando havis sub siaj piedoj iun taĉmentanon kaj kun granda entuziasmo surtretis al li la ripojn de la unua ĝis la lasta; la gastejestro denove laŭtis petante helpon por la Santa Hermandad: tiel do, la tuta domo plenis de ploroj, voĉoj, krioj, konfuzo, teruro, alarmo, bedaŭrindaĵoj, hako, frapoj, vergoj, kalcitroj kaj elfluo de sango.

Meze de ĉi ĥaoso, labirinto kaj senbrida furiozo, venis en la kapon de don Quijote la ideo, ke li staras metita, subite-seninvite, en la diskordo de la tendaro de Agramante,^[178] do li diris per tondra voĉo, kies vibrado skuis la tutan gastejon:

—Detenu vin! Ingu la glavojn! Aŭskultu min, se vi volas resti vivaj!

Ĉe tiel potenca voĉo, ĉiuj sin detenis, kaj li daŭrigis:

—Ĉu mi ne avertis vin, sinjoroj, ke ĉi kastelo estas ensorcĉita, kaj ke certe ia legio da demonoj loĝas ĉi tie? Por konfirmo de miaj vortoj, mi deziras, ke vi vidu propra-okule, kiel la diskordo de la tendaro de Agramante transiris al ni. Rimarku, kiel oni tie luktas por la spado, ĉi tie por la ĉevalo, transe por la aglo, preter por la helmo...^[179] dum ni batalas inter ni kaj ne aŭskultas unu la alian. Venu do via moŝto, sinjoro aŭditorio, kaj via moŝto, sinjoro pastro: la unua funkciu kiel reĝo Agramante, la alia kiel reĝo Sobrino,^[180] kaj faru pacon ĉi tie; ĉar, je la ĉiopova Dio, vere hontindas, ke tiom da gravaj sinjoroj, kiaj ni estas, mortigas sin reciproke pro bagateloj.

La taĉmentanoj, kiuj ne komprenis la frazeologion de don Quijote kaj vidis sin mistraktitaj de don Fernando, Cardenio kaj ties kamaradoj, ne emis trankviliĝi; sed la barbiro deziris la pacon, ĉar en la interbatiĝo lia barbo kaj la ŝarĝo-selo suferis nombron da ŝiroj. Sancho, kiel fidela servisto, obeis la plej etan ordonon de sia mastro; la kvar servistoj de don Luis same sin detenis, komprenante, ke nenion ili gajnus, se ili kondukus alie. Nur la gastejestro insistis, ke oni devus puni la insolenton de la freneza don Quijote, ĉar li ĉiam ĥaosigis la gastejon. Fine la tumulto cedis portempe al la kvieto, kaj en la imago de don Quijote kaj ĝis la tago de la lasta juĝo, la ŝarĝo-selo restis harniso, la pelvo kasko kaj la gastejo kastelo. La spiritoj do sereniĝis, la gastoj reamikiĝis dank' al la persvadoj de la aŭditorio kaj la pastro, kaj tiam la servistoj de don Luis insitis denove, ke li foriru kun ili.

Dum ili traktis kun la junulo, la aŭditorio, rakontinte al don Fernando, Cardenio kaj la pastro kion don Luis sciigis al li, konsiliĝis kun la trio, pri kiel li povus solvi la aferon. Fine oni interkonsentis, ke don Fernando rivelus sian personecon al la servistoj de don Luis kaj dirus al ili, ke li deziras, ke don Luis akompanu lin al Andaluzio, kie lia frato la markizo akceptus lin kun la honoro ŝuldata al lia rango; oni ja sciis,

ke don Luis tute ne havis tiam la intencon reveni hejmen, eĉ se oni dishakus lin en pecojn. La kvar servistoj, informite pri la moŝteco de don Fernando kaj pri la decido de don Luis, interkonsentis, ke tri irus hejmen raporti al lia patro pri la situacio, kaj la kvara restus por servi al don Luis sen lasi lin, ĝis la aliaj revenus preni lin kun si, aŭ ĝis oni ricevus la instrukciojn de la patro de don Luis rilate al la junulo.

Ĉi-maniere fariĝis paco en ĉi disputejo dank' al la aŭtoritato de Agramante kaj al la prudento de reĝo Sobrino.

Tamen, la malamiko de la konkordo kaj kontraŭulo de la paco^[181] vidis sin disdegnata kaj mokata, rimarkis kiom malmulte da frukto li rikoltis ĵetinte ĉi homojn en tiel implikitan labirinton, kaj decidis fari novan provon elkovi freŝajn konfliktojn kaj kverelojn. Okazis do, ke la taĉmentanoj, aŭdante pri la granda moŝteco de siaj kontraŭbatalantoj, trankviliĝis kaj sin retiris de la lukto, ĉar ŝajnis al ili, ke kia ajn estus ĝia rezulto, ili tamen perdis la batalon; sed unu taĉmentano, la sama kies ripojn don Fernando pistis kaj surtretis, memoris, ke inter liaj arestordonoj kontraŭ kelkaj deliktuloj troviĝas unu pri don Quijote, kies kapton dekretis la Santa Hermandad (kio Sancho prave timis siatempe) sub la akuzo, ke li metis la galerulojn en liberon; la taĉmentano do volis konstati, ĉu la priskribo el lia mandato konformas al la persono de don Quijote, sekve li detiris de sia sino ian pergamenan dokumenton, komencis legi ĝin lante, ĉar li ne estis sperta leganto, fiksitis ĉe ĉiu vorto la rigardon sur don Quijote, por kompari la detalojn el la mandato kun lia vizaĝo kaj fine konvinkiĝis ke, sen ia dubo, don Quijote estas la persono priskribita; tiam, jam certa pri lia identeco, la taĉmentano, kun la pergameno en la liva mano, ekkaptis per la dekstra la kavaliron je la kolo, tiel forte, ke li ne lasis lin spiri, kaj laŭtege kriis:

—Helpon al la Santa Hermandad! Kaj, por ke oni vidu, ke mi prave ĝin petas, jen la arest-ordono kontraŭ ĉi vojo-rabisto!

La pastro prenis la dokumenton, konstatis, ke la priskribo konformas al don Quijote, kaj ke la taĉmentano diris la veron. Sed la kavaliro, kiu vidis sin tiel mistraktata de ĉi senhonora fripono, eksplodis de kolero kaj, kun krakado de ostoj de lia korpo, per ambaŭ manoj kaptis, kiel li povis, la gorĝon de la taĉmentano kaj tiom stringis ĝin ke se li ne ricevus la helpon de siaj kunuloj, li lasus tie la vivon antaŭ ol don Quijote la stringadon.

La gastejestro, kiu havis la devon doni asiston al siaj kamaradoj, iris tuj helpi la taĉmentanon, dum la gastejestrino, vidante denove sian edzon implikita en alia lukto, levis la voĉon; tuj ŝia filino kaj Maritornes akompanis ŝin en ŝia kriado, petante la helpon de la ĉielo kaj de la ceteraj personoj de la loko; kaj Sancho, ĉe tia spektaklo, diris en si:

—Je Dio, mia mastro pravas rilate la ensorĉon de ĉi kastelo, ĉar ne eblas vivi en ĝi pace eĉ unu solan horon.

Don Fernando apartigis la du virojn je ilia granda kontento, ĉar ambaŭ firme enkroĉadis la manojn: la taĉmentano en la kolumo de la saĵo de don Quijote, kaj la hidalgo en la gorĝo de la alia; tamen la taĉmentanoj insistis, ke ili devas preni sian krimulon, kaj ke la ceteraj personoj helpu submeti kaj ligi lin, kiel postulis la servo al la reĝo kaj al la Santa Hermandad, je kies nomo denove ili petis helpon kaj asiston por aresti ĉi latronon kaj banditon de vojoj kaj padoj. Don Quijote ridadis ĉe tiaj argumentoj kaj fine diris kun granda flegmo:

—Kio do, bastarda kaj naŭza kanajlaro? Ĉu doni liberon al katenitaj, helpon al misfortunaj, manon al falintaj kaj

rimedon al mizeraj estas, laŭ vi, banditi sur la vojoj? Ha, perversa gento, kies eta kaj malica inteligento ne meritas, ke la ĉielo rivelu al vi la virton de la vaganta kavalirismo, kaj ankaŭ ne, ke vi komprenu kiel peke kaj nescie vi kondutas, ne respektante eĉ la ombron de vaganta kavaliro, des malpli lian personon! Kio do, taĉmento da latronoj, ne taĉmentanoj, sed vojaj rabistoj kun licenco de la Santa Hermandad? Diru, kiu idioto, subskribis la ordonon de aresto kontraŭ tia kavaliro kiel mi? Ĉu li ne scias, ke la vagantaj kavaliroj dependas de nenia jurisdikcio, ke ili havas sian glavon kiel leĝon, sian kuraĝon kiel ĉarton kaj sian propran volon kiel kodon? Kiu idioto, mi ripetas, ne scias, ke ekzistas nenia nobel-titolo kun tiom da privilegioj kaj prerogativoj, kiom da ili vaganta kavaliro akiras en la tago kiam li estas armita kaj sin fordonas al sia rigora profesio? Kiu vaganta kavaliro iam pagis imposton, akcizon, tributon, reĝan kontribucion aŭ doganon? Kiu tajloro iam prezentis al li kalkulon pri vestoj al li faritaj? Kiu kastelmastro regalis lin en festeno kaj poste petis de li ties partopagon? Kiu reĝo ne invitis lin al sia tablo? Kiu pucelo ne enamiĝis al li kaj sin donis senhezite al lia volo kaj plezuro? Kaj fine, kiu vaganta kavaliro iama, nuna aŭ futura ne havus kuraĝon sufiĉan por, li sola, vergi kvarcentfoje kvarcent taĉmentanojn, se ili aŭdacus lin alfronti?

[175] Neologismo. Hispane «morrión»; france «morion»; angle «morion». Speco de kasko antikva.

[176] En la hispana, kiam proverbo estas tre konata, oni kelkfoje mencias nur ĝian unuan parton. La proverbo kompleta tekstas: «Tien iras leĝoj, kien volas reĝoj».

[177] Hispana proverbo: oni konformiĝu, same al la sukceso, kiel al la fiasko de siaj pretendoj aŭ deziroj.

[178] Aludo al epizodo de la verko de Ariosto (1474-1533), *Rolando freneza* (kanto 27-a).

[179] Nova aludo al la sama epizodo de *Rolando freneza*, kie oni pridisputas spadon, ĉevalon kaj aglon, sed ne helmon, kiun don Quijote, en sia ekzaltiĝo, aldonis al la listo.

[180] Dank' al la aŭtoritato de la unua kaj al la aĝo kaj prudento de la dua, restariĝis la paco en ilia tendaro, laŭ la menciita verko de Ariosto.

[181] T.e. la diablo.

Ĉapitro 46

Pri la rimarkinda aventuro de la taĉmentanoj kaj la granda feroco de nia bona kavaliro don Quijote

Dum tiel parolis don Quijote, la pastro klopodis persvadi la taĉmentanojn, ke la cerbo de nia hidalgo iris promeni, kiel ili mem povus konstati per liaj vortoj kaj faroj kaj, ke, sekve, ili ne bezonis persisti en sia intenco aresti kaj forkonduki lin, ĉar, se jes, ili devus liberigi lin poste pro lia mensa perturbo; la taĉmentano de la mandato respondis al tio, ke al li ne koncernas juĝi pri la frenezo de don Quijote, ke li devas obei la ordonojn de sia superulo, kaj ke, post ol oni enkarcerigus lin, al li estus tute same, se oni donus al li centfoje la liberon.

—Tamen —diris la pastro— ĉi-foje vi ne prenos lin kun vi, ĉar, ŝajnas, li ne lasos sin konduki.

Tiom da argumentoj prezentis la pastro, kaj tiom da frenezaĵoj faris don Quijote, ke la taĉmentanoj eĉ pli frenezus ol li, se ili fine ne estus konvinkiĝintaj pri la afekcio de don Quijote; tiel do, ili konsideris pli bone trankviligi sin kaj eĉ peri la pacon inter la barbiro kaj Sancho Panza, kiuj montris ankoraŭ fortan rankoron en sia disputo. Fine, kiel membroj de la justico, ili intervenis kaj arbitraciis en la afero, tiele, ke ambaŭ partioj restis, se ne plene, almenaŭ parte kontentaj, ĉar oni disponis, ke ili faru la interŝanĝon de la ŝarĝo-seloj, sed ne de la ventrobendoj nek de la bridoj. Rilate al la kasko de Mambrino, la pastro, kaŝe kaj nerimarkate de don Quijote, donis por la pelvo ok realojn al la barbiro, kiu de sia flanko kvitancis la sumon kaj promesis ne plu plendi pro fraŭdo koncerne la pelvon, en la nuna aŭ en la futura tempo, amen.

Post ol oni trovis la solvon de ĉi du kvereloj, la plej gravaj kaj seriozaj, restis nur aranĝi, ke tri servistoj de don Luis reiru hejmen, kaj ke la alia akompanu sian mastron ĝis la loko, kien don Fernando dezirus lin konduki; kaj tial, ke la sorto jam komencis formeti barojn kaj igi pli facile irebla la vojon al la geamantoj kaj bravuloj de la gastejo, ĝi volis kompletigi la taskon per kontentiga fino: la servistoj konsentis kion don Luis petis de ili, kaj Clara tiel ĝojis je ilia decido, ke, rigardante ŝian vizaĝon, oni ne povis ne percepti la feliĉon de ŝia koro. Zoraida, kvankam ŝi ne bone komprenis ĉion okazintan, alterne ĝojis aŭ tristis, laŭ la esprimoj videblaj sur la aliaj, precipe sur ŝia hispano, al kies persono ŝi senĉese turnis sian rigardon plenan de amo. La gastejestro, al kiu ne pasis nerimarkita, ke la pastro donis monon al la barbiro, petis de don Quijote, ke li pagu por la difektitaj vin-sakoj kaj la perdita vino, kaj ĵuris, ke nek Rocinante, nek la azeno de Sancho forlasus la gastejon, antaŭ ol oni pagus al li ĝis la lasta groŝo. La pastro kaj don Fernando pagis la damaĝojn, kvankam ankaŭ la aŭditorio tre volonte sin proponis pagi li mem. Kaj tia paco kaj kvieto regis en ĉies koroj, ke, anstataŭ la diskordo de la tendaro de Agramante, kiel don Quijote diris, ŝajnis gastis ĉe la domo la paco kaj la kvieto de la tempoj de Oktavio;^[182] kaj laŭ la ĝenerala opinio, tio ŝuldiĝis al la bona intenco kaj riĉa elokvento de la sinjoro pastro kaj al la nekompareble donema spirito de don Fernando.

Don Quijote, vidante sin libera de tiom da problemoj, kaj propraj kaj de Sancho, pensis, ke estus bone daŭrigi la vojaĝon kaj fini la grandan aventuron, por kies plenumo oni lin vokis kaj elektis; tiel do, kun firma decido, li genuiĝis antaŭ Dorotea, kiu ne permesis al li diri ion, antaŭ ol li leviĝus, do don Quijote obee stariĝis kaj diris:

—Laŭ tre konata proverbo, bela sinjorino, la diligento estas patrino de la fortuno; en multaj kaj gravaj cirkonstancoj la

sperto montras, ke la aktiveco de aferisto sukcesigas eĉ duban negocon, sed nenie evidentas ĉi vero, kiel en la aferoj militaj, kie rapido kaj prompteco disrompas la preparojn de la malamiko kaj venkas ĝin, antaŭ ol ĝi povas organizi sian defendon. Mi diras tion, ĉarma kaj moŝta sinjorino, ĉar ŝajnas al mi, ke nia restado en ĉi kastelo havas jam nenian utilon, kaj eĉ povus kaŭzi al ni grandan damaĝon, kiel ni konstatos iun tagon. Ĉar, kiu scias, ĉu via malamiko, la giganto, ne ricevis informon, pere de sekretaj kaj diligentaj spionoj, ke mi iras detrui lin, kaj ĉu, dum ni perdas la tempon, li ne profitas ĝin, starigante sian defendon en nekonkerebla kastelo aŭ fortreso, kie vanus miaj klopodoj kaj la forto de mia senlaca brako? Tiel do, kara sinjorino, per nia diligento ni antaŭiĝu al liaj projektoj, kiel dirite, kaj tuj ekiru, ĉar, por ke via bona destino plenumiĝu, kiel vi deziras, vi ne devas atendi pli ol la tempon necesan ĝis mi renkontos vian kontraŭulon.

Don Quijote ĉesis paroli kaj atendis aplombe la respondon de la bela princino; kaj ŝi, kun majesta esprimo laŭa al la stilo de la hidalgo, respondis jene:

—Mi dankas al vi, sinjoro, ke vi tiel montras vian deziron servi min en mia granda misfortuno, kiel kavaliro kies funkcio kaj koncerno estas doni protekton al orfaj kaj senhelpaj; kaj Dio volu, ke mia deziro kaj la via plenumiĝu, por ke vi vidu, ke ekzistas en la mondo dankemaj virinoj. Rilate al mia forveturo, ĝi tuj okazu: mi ne havas alian volon ol la vian, do disponu pri mi tute laŭ via bontrovo kaj deziro, ĉar la virino, kiu iam konfidis al vi la defendon de sia persono kaj la restaŭron de sia potenco, ne devas kontraŭi kion via saĝo ordonas.

—Estu certa pri mia promeso, je Dio —respondis don Quijote —, ĉar, se tiel granda damo humiliĝas, mi ne volas perdi la okazon relevi ŝin al ŝia hereda trono. Ni jam ekiru: la

proverbo, ke en la tardo insidas danĝero, spronas mian deziron iri survoje. Neniam la ĉielo kreis, nek la infero vidis, ion kapablan peli min en timon kaj teruron, do, Sancho, selu Rocinante, harnisu vian azenon kaj la palefrenon^[183] de la reĝino, ni diru adiaŭ al la kastelmastro kaj al ĉi sinjoroj kaj tuj foriru.

Sancho, ĉion atente aŭskultinta, skuis la kapon kaj respondis:

—Ve, sinjoro, mi diru, kaj ĉi honestaj damoj min pardonu, ke en la vilaĝo oni malbonas, pli ol oni ĝenerale konas.

—Kia malbono, kapabla diskrediti min, povas ekzisti en ajna vilaĝo aŭ en ĉiuj urboj de la mondo, fripono?

—Se via moŝto koleras, mi prisilentos kion mi devus diri kiel bona ŝildisto, kaj kion bona servisto devus diri al sia mastro.

—Parolu laŭplaĉe —respondis don Quijote—, sed ne kun la intenco inspiri timon al mi; ĉar, se vi sentas timon, vi agas laŭ via naturo; kaj se mi estas sentima, mi agas laŭ la mia.

—Tute ne temas pri tio, ve al mi! —diris Sancho—, sed mi certas kaj asertas, ke ĉi sinjorino sin nomanta reĝino de la granda regno Micomicón, ne estas tia reĝino pli ol mia patrino; ĉar, se tian rangon ŝi havus, ŝi ne dediĉus sin froti sian muzelon kun unu el ĉi viroj kapoturne kaj postporde.

Dorotea ruĝiĝis ĉe la vortoj de Sancho, ĉar, efektive, ŝia edzo don Fernando, kaŝante sin de aliaj okuloj, kelkfoje frandis per la lipoj parton de de la premio gajnita de lia amo. Sancho rimarkis tion, kaj ŝajnis al li, ke tiel senhonta konduto pli konformus al meretrico ol al reĝino de tiel grava regno. Dorotea, nek povis, nek volis respondi la aserton de Sancho, do ŝi lasis lin daŭrigi.

—Mi diras tion, sinjoro —aldonis Sancho—, ĉar, se la viro tiel grandioze ĝuanta la vivon en ĉi gastejo fine rikoltos la frukton de nia laboro, post ol ni iris sur vojoj kaj padoj kaj elportis nombron da kruelaj noktoj kaj eĉ pli kruelaj tagoj, ne ekzistas do motivo, ke mi rapidu seli Rocinante, harnisi la azenon aŭ pretigi la palefrenon; prefere ni tenu nin trankvilaj, kaj ĉiu putino ŝpinu, kaj ni manĝu.^[184]

Je Dio, kiel ege koleris don Quijote, aŭdante la insolentojn de sia ŝildisto! Tiel terure li furiozis, ke kun sinpela voĉo, trema lango kaj fajraj okuloj, li kriis:

—Ho vi, kampulaĉo kruda kaj nescia, fripono impertinenta, fibuŝa, falsa kaj malica! Ĉu vi aŭdacas paroli tiamaniere antaŭ mi kaj antaŭ ĉi moŝtaj damoj? Foriru el mia vido, monstro de la naturo, ŝranko de mensogoj, magazeno de trompoj, silo de friponaĵoj, inventisto de kalumnioj, diskrianto de absurdoj, malamiko de la respekto ŝuldata al la reĝaj personoj! Foriru, ne plu aperu antaŭ mi, aŭ vi spertos la pezon de mia kolero!

Tion dirante, don Quijote kuntiris la brovojn, pufigis la vangojn, ĵetis ĉien la rigardon, kaj per la dekstra piedo donis fortan frapon sur la plankon, kio montris, kiel bolis la rabio en lia brusto. Ĉi timigaj vortoj kaj furiozaj gestoj tiel teruris Sanchon, ke li tre ĝojus, se la tero disiĝus tiam sub liaj piedoj por engluti lin; kaj sen scii kion alian fari, li turnis la dorson kaj forpaŝis de la kolera ĉeesto de sia mastro. Sed la saĝa Dorotea, kiu jam tre bone konis la naturon de don Quijote, diris al li kvietige:

—Ne ĉagreniĝu, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno, por la absurdoj ĵus diritaj de via bona ŝildisto, ĉar eble li parolis ne senprave; kaj cetere li ne farus falsan akuzon, se konsideri lian prudenton kaj kristanan konsciencon. Tiel do, oni devas kredi sen ia dubo, ke, pro tio, ke, laŭ viaj diroj, en ĉi kastelo

ĉio okazas sub ensorĉo, Sancho certe vidis nur ian inferan iluzion, tiel ofendan al mia virto.

—Mi ĵuras je la ĉiopova Dio —diris tiam don Quijote—, ke Via Alteco trafis la ĝustan klavon: ia aĉa vizio ŝvebis antaŭ la okuloj de la povra Sancho, kaj montris al li kion certe li ne povus vidi ekstensorĉe, ĉar mi tre bone scias, kiel bona kaj naiva estas ĉi kompatindulo, nekapabla false atesti.

—Vi pravas, kaj tiel restu la afero —diris don Fernando—, do, via moŝto, sinjoro don Quijote, devas pardoni lin kaj lin revoki denove en la sinon de via favoro, *sicut erat in principio*,^[185] antaŭ ol la vizioj renversis lian cerbon.

—Mi pardonas lin —diris don Quijote.

La pastro iris serĉi Sanchon, kiu, tre humile, revenis, genuiĝis antaŭ sia mastro, petis lian manon kaj ĝin kisis. Poste la hidalgo donis al li sian benon kaj diris:

—Sancho, mia filo, mi pensas, ke vi jam konvinkiĝis, ke mi ripete diris al vi la veron, asertante, ke ĉio en ĉi kastelo okazas sub ensorĉo.

—Jes, vi pravas —respondis Sancho—. Sed mi esceptus la aferon de la plejdo: ĝi okazis laŭ natura maniero.

—Ne kredu tion. Se temus pri ordinara afero, mi estus venĝinta vin tiam kaj eĉ nun —diris don Quijote—. Sed nek tiam nek nun mi povis venĝi vin, ĉar nenie mi vidis ajnan personon kulpan pri la ofendo al vi farita.

Ĉiuj sentis scivolon koncerne la aferon de la plejdo, kaj tiam la gastejestro detale rakontis pri la kaprioloj de Sancho en la aero, kio provokis ĉies ridegojn; kaj la ŝildisto forte hontus, se lia mastro ne estus denove certiginta al li, ke la bernado konsistis el nura ensorĉo. Tamen, la stulto de Sancho ne tiel

grandis, ke li kredus absoluta vero sen ia ombro da dubo, ke lin bernis, ne personoj el karno kaj ostoj sed fantomoj nerealaj kaj imagaj, kiel lia mastro kredis kaj asertis.

Jam pasis du tagoj de kiam ĉi eminenta kompanio alvenis al la gastejo; kaj pensante, ke jam sonis la horo forveturi, ili trovis la manieron ŝpari al Dorotea kaj don Fernando la penon akompani don Quijote al ties vilaĝo sub la preteksto de la restaŭro de la reĝino Micomicona; anstataŭe la pastro kaj la barbiro kondukus lin al lia lando kaj provus resanigi lin de ties frenezo hejme, kiel ili deziris. Tiucele oni interkonsentis kun ĉaristo, tiam okaze pasanta survoje kun ĉaro tirata de bovoj, kaj, por la transporto de don Quijote, oni faris specon de kaĝo kun lignaj stangoj interkrucitaj, kie li povus oportune sidi; poste don Fernando kaj liaj kamaradoj, la servistoj de don Luis, la taĉmentanoj kaj la gastejestro, maskis al si la vizaĝon kaj alivestis sin, ĉiu laŭ sia plaĉo, konforme al la konsiloj kaj instrukcioj de la pastro, por ke la hidalgo prenu ilin por personoj diferencaj de liaj konatoj de la gastejo; poste, en profunda silento, ili eniris en la ĉambron, kie don Quijote dormis kaj ripozis post la lastaj konfliktoj, proksimiĝis al li, kuŝanta sen eĉ la plej eta suspekto pri tia komploto, forte lin ekkaptis kaj firme kunligis liajn manojn kaj piedojn, tiele, ke kiam li abrupte vekiĝis, li povis, nek movi sin, nek fari alion ol gapi kaj miri, vidante antaŭ si tiel strangajn vizaĝojn; sed li tuj falis en la iluzion senĉese kreatan de lia freneza imago, kaj kredis, ke la figuroj estas fantomoj de la ensorĉita kastelo, kaj ke oni ensorĉis lin mem, tial, ke li ne povis sin movi aŭ defendi; kaj ĉio okazis, ĝuste kiel atendis la pastro, elpensinto de la tuta maĥinacio.

El la grupo, nur Sancho konservis sian propran figuron kaj sian ordinaran prudenton, kaj, kvankam nur ete mankis al li por suferi la saman malsanon de lia mastro, al li ne pasis nerimarkita la vera personeco de la duontorditaj figuroj; sed

li ne kuraĝis aperti la buŝon, ĝis li sciis, kian finon havus la rabo kaj kapto de lia mastro; kaj ankaŭ la hidalgo diris nenion, same atendente la rezultaton de sia misfortuno; kaj okazis, ke oni portis en la ĉambron la kaĝon, lin enpuŝis en ĝian internon, alnajlis la fermotabulojn, ke li ne povu forskui ilin, surŝultrigis la kaĝon, kaj, en la momento de la eliro, aŭdiĝis voĉo timiga (tiel timiga, kiel povis ĝin fari la barbiro, majstro Nicolás) diranta:

—Ho, Kavaliro de la Trista Mieno! Ne afliktiĝu pro via enfermiteco, ĉar ĝi necesas por la plej rapida solvo de la aventuro entreprenita de via granda kuraĝo. Ĝi finiĝos, kiam la feroca leono de La Mancha kaj la blanka kolombino de El Toboso kuŝos kune, post ol ili humile klinos sian fieran kapon sub la molan jugon de edziĝo; el tiel eksterordinara nupto elvenos al la lumo de la mondo la bravaj leonidoj, kiuj konkuros kun la detruaj krifoj de la sentima patro. Kaj ĉi tio okazos antaŭ ol la persekutanto de la fuĝanta nimfo^[186] faros dufoje la viziton, en sia rapida kaj natura kurso, al la lumaj konstelacioj. Kaj vi, ho plej nobla kaj obea el ĉiuj ŝildistoj iam ekzistantaj kun glavo ĉe la zono, barbo sur la vizaĝo kaj olfakto en la nazo, ne falu en ĉagrenon aŭ aflikton, vidante antaŭ viaj propraj okuloj, kaj en tia stato, la floron de la vaganta kavalirismo, ĉar tre baldaŭ, se plaĉos al la granda arkitekto de la universo, vi vidos vin en tiel alta kaj sublima pozicio, ke vi eĉ ne rekonos vin, kaj ne vaniĝos do la promesoj al vi faritaj de via bona mastro. Kaj je la nomo de la saĝulino Mensogoniana mi konfirmas al vi, ke vian salajron vi ricevos, kiel vi vidos propraokule; sekvu la paŝojn de la kuraĝa kaj ensorĉita kavaliro, ĉar konvenas, ke vi akompanu lin, ĝis la loko, kie vi ambaŭ restos. Nun, mi ne rajtas plu paroli, do, adiaŭ, mi reiras kien mi bone scias.

Ĉe la fino de la profetaĵo, la barbiro levis la voĉon kaj tuj lasis ĝin fali en tiel delikatan modulon, ke eĉ la personoj jam informitaj pri la ŝerco preskaŭ kredis vera kion ili aŭskultis.

Rilate al don Quijote, la promesoj de la orakolo konsolis lin, ĉar li tuj komprenis ĝian signifon, kaj vidis, ke ĝi aŭguris lian kunvivadon, en sankta kaj leĝa edziĝo, kun lia kara Dulcinea de El Toboso, de kies feliĉa ventro elvenus la leonidoj, liaj filoj, por la eterna gloro de La Mancha. Sincere kaj firme kredante tion, li levis la voĉon kaj diris kun profunda suspiro:

—Ho vi, kiu ajn vi estas, profetanto de tiom da bono! Turnu vin, je mia nomo, al la saĝa sorĉisto, kiu zorgas miajn aferojn, kaj petu de li, ke li ne lasu min pereii en ĉi moviĝanta prizono, kie mi nun sidas, ĝis mi povos vidi la plenumon de tiel ĝojaj kaj nekompareblaj promesoj al mi faritaj ĉi tie; ĉar, se ili efektiviĝos, mi rigardos gloraj la torturojn de ĉi karceroj, kaj komfortaj ĉi katenojn sur mi; kaj ĉi dura batalo, kie mi perforte kuŝas, ŝajnos al mi mola kaj feliĉa lito nupta. Rilate la rekompencojn al mia ŝildisto, lia honesto kaj bona konduto donas al mi fidon, ke li ne lasos min en favoraj aŭ kontraŭaj cirkonstancoj, kaj, se pro mia misorto, aŭ la lia, mi ne povos doni al li la insulon promesitan, aŭ ties ekvivalenton, almenaŭ li ne perdos sian salajron, ĉar mi jam specifikis en mia testamento, kiom li devas ricevi, proporcie, ne al siaj multaj kaj bonaj servoj, sed al miaj rimedoj.

Sancho Panza tre respektive sin klinis kaj kisis la du manojn de don Quijote, ĉar unu solan li ne povus, tial, ke ambaŭ estis kunligitaj. Poste la fantomoj denove surŝultrigis la kaĝon kaj ĝin lokis en la bovo-ĉaron.

[182] Aludo al longa periodo de paco en la epoko de la Romana imperiestro Oktavio Aŭgusto (63-14 a.K.).

[183] Hispane «palafrén»; france «palefroi»; angle «palfrey». Speciala ĉevalo rajdata de reĝoj, princoj kaj damoj okaze de

ceremonioj, procesioj kaj aliaj solenaĵoj.

[184] Iam proverba esprimo inter prostituistoj. Metafore, agi plej konvene, laŭ la okazoj.

[185] Latinaĵo: «kiel en la komenco».

[186] La sundio Apolono kaj Dafna.

Ĉapitro 47

Pri la stranga ensorĉiteco de don Quijote de La Mancha kaj pri aliaj famaj eventoj

Kiam don Quijote vidis sin enkaĝigita kaj metita en la ĉaro, li diris:

—Mi legis multe da gravaj historioj pri vagantaj kavaliroj, sed neniam legis, vidis aŭ aŭskultis, ke oni povus transporti ĉi-maniere la ensorĉitajn kavalirojn, kaj kun la tardemo propra al ĉi pigraj kaj lantaj animaloj; kutime oni portas ilin kun mirinda rapido tra la aero, interne de nigra aŭ griza nubo, en fajra ĉaro, aŭ sur hipogrifo aŭ simila besto. Ke oni min transportas nun per bovo-ĉaro tute konfuzas min, je Dio, sed eble la kavalirismo kaj la magio de nia epoko devas sekvi alian vojon diferencon de la kurso antikva. Povas okazi ankaŭ, ke, pro tio, ke mi estas nova kavaliro en la mondo kaj la unua reviviginto de la jam forgesita profesio de la kavalirismo, oni inventis aliajn specojn de ensorĉo kaj aliajn metodojn por la transporto de la ensorĉitoj. Kion vi opinias pri la afero, Sancho, mia filo?

—Mi ne scias kion pensi —respondis Sancho—, ĉar mi ne kleras kiel vi rilate al la kavaliraj tekstoj; sed mi ne hezitus ĵuri, ke ĉi ĉirkaŭaj vizioj ne estas tute katolikaj.

—Katolikaj? Kia ideo! —diris don Quijote—. Kiel ili povus esti katolikaj, se temas pri demonoj alprenintaj fantaziajn korpojn por meti min en ĉi staton? Se vi volas konstati, ke mi diras la veron, tuŝu kaj palpu ilin, kaj vi vidos, ke ilia korpo konsistas nur el aero kaj el ekstera ŝajno.

—Je Dio, sinjoro —respondis Sancho—, mi jam tuŝis ilin, kaj jen, ĉi diablo tiel okupata kaj aktiva montriĝas iom karn-abunda, kaj, krome, distingiĝas per io tre diferenca de la karakterizaĵo de la demonoj; laŭdire ili fetoras je sulfuro kaj aliaj odoraĉoj, sed ĉi alia diablo odoras je ambro ĝis la distanco de unu mejlo.

Per tia rimarko Sancho aludis al don Fernando, kiesodoro, pro lia nobeleco certe estis tia, kiel la ŝildisto diris.^[187]

—Ne miru pri tio, amiko Sancho —diris don Quijote—. Sciu, ke la diabloj tre ruzas, kaj, kvankam ili portas sian propran odoron, ili odoras je nenio, ĉar ili estas spiritoj, kaj, se ili odorus, ili odorus, ne je io bona kaj agrabla, sed repuŝa kaj stinka, tial, ke ili, kie ajn ili troviĝas, portas la inferon kun si kaj ne povas sperti ian mildiĝon de siaj turmentoj; nu, la bonaj odoroj plezurigas kaj logas, do ne eblas al ili odori je io agrabla; kaj se al vi ŝajnas, ke la diablo de vi menciita odoras je ambro, aŭ vi trompiĝas, aŭ li volas vin trompi, ke vi ne prenu lin por demono.

Ĉe tia konversacio inter la mastro kaj la servisto, don Fernando kaj Cardenio timis, ke Sancho povus tute diveni kaj klarigi al si ilian konspiron, pri kies ekzisto li jam tre suspektis, do ili decidis anticipi la forveturon, kaj, vokinte alflanke la gastejstron, ordonis lin seli Rocinante kaj harnisi la azenon de Sancho, kion li rapide faris. Dume la pastro interkonsentis kun la taĉmentanoj, ke ili akompanos lin ĝis lia vilaĝo por iom da mono ĉiutage. Cardenio pendigis de la selo de Rocinante la ŝildon sur unu flanko kaj la barbo-pelvon sur la alia, signis al Sancho, ke li surzeniĝu kaj ekprenu la bridon de Rocinante, kaj postenigis la du taĉmentanojn kun ties pafiloj, ambaŭflanke de la ĉaro; sed, antaŭ ol ĝi ekiris, la gastejstrino, ties filino kaj Maritornes elvenis diri adiaŭ al don Quijote, ŝajnigante, ke ili ploras de aflikto pro lia misfortuno.

—Ne ploru, karaj sinjorinoj —diris tiam don Quijote—. Ĉi sortobatoj estas propraj al la membroj de mia profesio, kaj se plagoj ne falus sur min, mi ne konsiderus min fama kavaliro vaganta; nenio simila okazas al la kavaliroj mankaj de gravo kaj signifo, tial, ke oni ignoras ilin en la mondo; dume la kuraĝaj spertas la malon, ĉar multaj princoj kaj aliaj kavaliroj envias ilian virton kaj aŭdacon kaj klopodas firimede detrui ilin. Tamen, la virto tiom potencas, ke per si mem ĝi emerĝos venke el ĉia provo, spite al la tuta nekromancio elpensita de Zoroastro, kaj brilos en la mondo kiel la suno en la ĉielo. Pardonu min, belaj damoj, se preteratente mi kaŭzis al vi ian ĉagrenon, ĉar intence kaj volonte mi neniam miskondutis kontraŭ ajna persono. Preĝu al Dio, ke li elprenu min el ĉi prizono, kien ia fiintenca sorĉisto min ĵetis, kaj, se iam mi vidos min libera, mi tute ne forgesos la favorojn de vi ricevitaĵn en ĉi kastelo, kaj reciprokos, rekompencos kaj repagos ilin, kiel ili meritas.

Dum la damoj kaj don Quijote tiel interparolis, la pastro kaj la barbiro adiaŭis al don Fernando kaj ties kamaradoj, al la kapitano kaj ties frato, kaj al la grupo de feliĉaj sinjorinoj, speciale al Dorotea kaj Luscinda. Ĉiuj brakumis sin reciproke kaj promesis sendi unu la alian siajn novaĵojn. Don Fernando informis al la pastro, kien li devos skribi al li rilate al la sorto de don Quijote. Li insistis, ke nenio donus al la pli da plezuro ol esti informata ĉi-rilate, kaj ke, de sia flanko, li sendus al la pastro la novaĵojn, kiuj povus plaĉi al li, kiel, por ekzemplo, lia propra edziĝo, la bapto de Zoraida, la afero de don Luis kaj la reveno hejmen de Luscinda. La pastro promesis akurate plenumi lian deziron, kaj denove ili brakumis unuj la aliajn kaj denove interŝanĝis komplimentojn. Tiam la gastejestro sin turnis al la pastro kaj transdonis al li kelke da paperoj, dirante, ke li trovis ilin en la sama valizo, kie aperis la novelo *La stulta scivolo*, kaj ke, tial, ke ĝia mastro ne revenis, kaj li ne scipovas legi, al li estus tute same, se la pastro volus akcepti ilin por si. La pastro dankis lin,

komencis foliumi la manuskripton, vidis la titolon *Rinconete y Cortadillo*,^[188] kaj supozis, ke temas pri novelo eble tiel bona kiel *La stulta scivolo*, ĉar sendube la sama aŭtoro verkis ambaŭ. La pastro do akceptis ĝin kun la intenco ĝin legi en la unua oportuna okazo.

Li kaj lia amiko la barbiro, maskitaj por ke don Quijote ne rekonu ilin, surseliĝis kaj ekiris post la ĉaro. La ordo de la procesio estis jena: unue la ĉaro gvidata de sia mastro; ambaŭflanke, kiel dirite, la taĉmentanoj kun siaj pafiloj; poste, Sancho Panza sur sia azeno kondukis per la brido Rocinante; fine la pastro kaj la barbiro, kun serioza kaj aplomba sinteno, kaj kun la vizaĝo kovrita, kiel jam menciite, rajdis sur siaj fortaj muloj ne pli rapide ol permesis la lanta paŝado de la bovoj.

Apogita sur la stangoj, kun la manoj kunligitaj kaj la kruroj streĉitaj, don Quijote sidis tiel silente kaj pasive en la kaĝo, ke ŝajnis, ke li estas, ne viro el karno kaj ostoj, sed statuo ŝtona. Lante kaj silente do, ili iris ses mejlojn kaj alvenis al valo, kiun la ĉaristo pensis konvena loko por ripozo kaj por la paŝtado de la bovoj; sed la barbiro, interkonsiliĝinte kun la pastro, opiniis, ke ili devus iri iom pli antaŭen, ĉar li sciis, ke, trans unu monteto proksime videbla, troviĝas alia valo pli bona kaj pli herboriĉa. Oni do akceptis la konsilon de la barbiro kaj ree ekiris.

Ĉi-momente la pastro turnis la vizaĝon kaj vidis post si ses aŭ sep rajdantojn bone ekipitajn, kiuj baldaŭ atingis la procesion, ĉar ili iris, ne kun la flegmo kaj la haltemo de la bovoj, sed kiel homoj rajdantaj sur muloj de kanoniko kaj, krome, dezirantaj baldaŭ siesti en gastejo videbla tri mejlojn antaŭe. La diligentaj atingis do la lantajn kaj post ĝentilaj salutoj reciprokaj, unu el la ĵusvenintoj, kanoniko de Toledo kaj ĉefo de la ceteraj, rimarkis la procesion kun la ĉaro, la taĉmentanoj, Sancho, Rocinante, la pastro, la barbiro, kaj

speciale don Quijote ligita kaj enkaĝigita, kaj ne povis ne demandi, kial oni transportas viron tiamaniere, kvankam li supozis, vidante la insignojn de la taĉmentanoj, ke la kaptito devas esti ia vojo-rabisto aŭ simila krimulo, kies puno koncernas al la Santa Hermandad. Li demandis ĉi-rilate unu el la taĉmentanoj, kiu respondis:

—Sinjoro, mi ne scias, kial oni transportas ĉi kavaliron tiamaniere. Li mem diru la motivon.

Don Quijote aŭdis la dialogon kaj intervenis:

—Ĉu eble viaj moŝtoj kleras rilate al la aferoj de la vaganta kavalirismo? Se jes, mi rakontos al vi mian misfortunon; se ne, estus vane paroli pri ĝi.

Ĉe tio, la pastro kaj la barbiro vidis la rajdantojn babili kun don Quijote de La Mancha kaj proksimiĝis al ili kun la intenco klarigi la aferon tiel, ke ilia komploto ne elmontriĝu. Sed la kanoniko respondis al don Quijote:

—Vere, frato, rilate al la kavaliraj libroj mi estas pli klera ol rilate al *Las sùmulas* de Villalpando;^[189] do, se nur tion vi postulas, eble vi konsentos informi min laŭ via deziro.

—Konsentite do, certe —diris don Quijote—. Sciu, sinjoro kavaliro, ke mi troviĝas ensorĉita en ĉi kaĝo kaŭze de la envio kaj trompemo de malicaj magiistoj; ĉar la virton persekutas la homoj perversaj, pli ol la bonaj ĝin amas. Mi estas vaganta kavaliro; ne el tiuj, kies nomojn la famo preferas forgesi poreterne, sed el la kavaliroj, kiuj, spite al la envio kaj al la tuta bando de magoj el Persujo, de bramanoj el Hindujo kaj de ginosofistoj^[190] el Etiopio, skribos siajn nomojn en la templo de la eterneco, por ke, en la futuraj jarcentoj, ili servu kiel modelo kaj ekzemplo al la vagantaj

kavaliroj, kaj inspiru al ili la vojon sekvendan, se ili volas atingi la honoran kulminon de la gloro milita.

—La kavaliro don Quijote de La Mancha pravas —intervenis tiam la pastro—, ĉar li veturas subsorĉe en la ĉaro, ne pro siaj mankoj aŭ pekoj, sed pro la misvolo de la kontraŭuloj de la virto kaj de la abomenantoj de la kuraĝo. Li estas, sinjoro, la Kavaliro de la Trista Mieno (eble vi jam aŭdis paroli pri li), kies kuraĝaj faroj kaj grandaj heroaĵoj estos gravuritaj, kiom ajn la envio kaj la malico klopodos ignori kaj kaŝi ilin, en duraj bronzoj kaj en eternaj marmoroj.

Kiam la kanoniko aŭdis la kaptitan kaj la liberan paroli en la sama stilo, li preskaŭ faris al si la signon de la kruco pro surprizo, kaj ne povis eltiri sin el sia miro, kio same okazis al liaj akompanantoj. Tiam Sancho Panza, proksimiĝinta por aŭskulti la konversacion, metis klaron en la konfuzon,^[191] dirante:

—Nun, sinjoroj, ŝatu, aŭ ne ŝatu min pro miaj vortoj, sed mia sinjoro don Quijote vere ne estas pli ensorĉita ol mia patrino. Kiel la ceteraj personoj, li posedas sian tutan prudenton, manĝas, trinkas, kaj faras siajn bezonojn, kiel li faris ĝuste hieraŭ, antaŭ ol oni metis lin en la kaĝon. Se tiel do, ĉu mi kredis lian ensorĉon? Mi ofte aŭdis diri, ke la ensorĉitoj nek manĝas, nek dormas, nek parolas, sed mia mastro, se oni ne interrompas lin, parolas pli ol tridek advokatoj.

Poste li turnis sin al la pastro kaj daŭrigis:

—Ha, vi, sinjoro pastro! Ĉu via moŝto pensas, ke mi ne rekonis vin, kaj ke mi ne divenas kaj komprenas kion vi celas per ĉi ensorĉoj? Sciu, mi konas vin, kiom ajn vi kovras al vi la vizaĝon, kaj sciu, mi komprenas vin, kiom ajn vi maskas viajn artifikojn. Vere, ne povas ekzisti virto kie regas envio, nek donacema spirito kie regas avareco. Je la diablo, via

pastra moŝto kulpas tion, ke mia sinjoro ne estas jam edzo de la princino Micomicona, kaj ke mi ne havas, almenaŭ, la rangon de grafo, ĉar oni ne povus atendi alion de la grandanimeco de mia mastro, la Kavaliro de la Trista Mieno, kaj de la gravo de miaj servoj; sed mi vidas nun, ke oni diras prave, ke la rado de la Fortuno rapidas pli ol rado de muelejo, kaj ke la hieraŭaj superstarantoj kuŝas hodiaŭ surtere. Nu, mi sentas bedaŭron pri miaj filoj kaj edzino, ĉar, kiam ili povus kaj devus vidi sian patron reveni hejmen gubernatoro aŭ vicreĝo de la insulo aŭ regno, ili vidus lin eniri stalisto. Mi diras ĉi tion, sinjoro pastro, nur por urĝi vin, ke via konscienco konsideru, kiel aĉe vi traktas mian sinjoron. Zorgu, ke Dio ne igu vin respondi en la transa mondo pri ĉi enfermiteco de mia mastro kaj pri la helpoj kaj favoroj dume ne faritaj de li, ĉar prizonulo.

—Ho ve, jen la kulmino! —intervenis ĉi-momente la barbiro—. Ĉu ankaŭ vi, Sancho apartenas al la frataro de via mastro? Je Dio, mi komencas pensi, ke vi meritas akompani lin en la kaĝo, kaj ke fine vi estos tiel ensorĉita kiel li, se konsideri, kiom da lia humoro kaj lia kavalirismo vi asimilis! En mava horo vi gravediĝis per liaj promesoj, kaj en mava momento via sopirata insulo enbatiĝis en vian kapon!

—Mi gravediĝis de neniu —respondis Sancho—, kaj mi estas tia viro, ke eĉ ne al la reĝo mem mi permesus gravedigi min. Kvankam paŭpera, mi kondukas kiel oldkristano kaj ŝuldas neniom al ajna persono. Se mi deziras insulon, aliaj deziras ion pli mavan. Oni estas filo de siaj agoj kaj mi, kiel homo, povus fariĝi papo, des pli do gubernatoro de iu insulo, se konsideri, ke mia mastro kapablas gajni tiom da ili, ke li ne sciis kion fari kun ili. Zorgu, kiel vi parolas, barbira moŝto, ĉar ne ĉio konsistas en la pritondado de barboj, kaj ekzistas ioma diferenco inter Petro kaj Petro. Mi diras tion, ĉar ni bone konas unu la alian, kaj oni min ne povas trompi per falsa

ĵetkubo. Kaj pri la ensorĉo de mia mastro, Dio konas la veron; kaj punkto, ĉar preferindas ne plu agiti la kaĉon.

La barbiro ne volis respondi al la ŝildisto, por ke ĉi lasta ne rivelu, per siaj naivaĵoj, kion li kaj la pastro tiel multe klopodis kaŝi; kaj pro la sama motivo la pastro invitis la kanonikon rajdi kun li iom pli antaŭe por informi lin pri la mistero de la kaĝo kaj pri aliaj amuzaj aferoj. La kanoniko konsentis, antaŭis sin kun siaj servistoj kaj tre atentis kion la pastro rakontis pri la karaktero, vivo, frenezo kaj kutimoj de don Quijote, kaj, pli resume, pri la komenco kaj motivo de liaj ekstravagancoj, pri la serio de liaj aventuroj ĝis la momento kiam oni metis lin en la kaĝon, kaj fine pri ilia projekto provi iel resanigi lin de lia frenezo. Denove miris la kanoniko kaj ties servistoj je la stranga historio de don Quijote, kaj, kiam ĝi finiĝis, li diris:

—Vere, sinjoro pastro, mi havas la opinion, ke la tiel nomataj kavaliraj libroj tre nocas en la regno; kaj kvankam mi legis, puŝite de vana kaj falsa inklino, la komencon de la pliparto de tiaj verkoj, neniam mi paciencis fini eĉ unu el ili, ĉar, ŝajnas al mi, ĉiuj prezentas proksimume la saman enhavon, kun apenaŭaj diferencoj. Mi kredas ke ĉi speco de libroj kaj intrigoj devenas de la tiel nomataj miletaj fabeloj,^[192] t.e. ekstravagancaj rakontoj kies celo estas, ne instrui, sed nur distri, male ol la moralaj fabeloj, kiuj samtempe instruas kaj delectas. Kvankam la kavaliraj libroj precipe celas distri, mi ne komprenas, kiel ili povas sukcesi, se konsideri, ke ili plenas ĝisrande de monstraj absurdoj. La spirito plezuras antaŭ io fakta aŭ imaga, el kiu fontas belo kaj harmonio. Sed kian belon aŭ kian proporcion inter la partoj kaj la tuto, aŭ inter la tuto kaj ties partoj povas montri verko aŭ fabelo, kie deksepjara knabo dividas per unu sola hako, kvazaŭ marcipanon, ian giganton grandan kiel turo, aŭ kie, en la priskribo de batalo, oni rakontas, ke ĉe la flanko de la malamikoj staras unu miliono da batalantoj, kaj se la heroo

de la libro kontraŭas ilin, ni devas akcepti nepre, ĉu vole, ĉu nevole, ke tia kavaliro sola venkas per nur la kuraĝo de sia forta brako? Kaj kion diri pri tio, kiel facilanime hereda reĝino aŭ imperiestrino kondukas inter la brakoj de nekonata kavaliro vaganta? Kia spirito, se ne tute nescia kaj barbara, povas trovi distron, legante, ke granda turo plena de kavaliroj velas sur la maro kiel ŝipo sub favora vento, kaj ke ĝi troviĝas ĉi-nokte en Lombardio kaj morgaŭ matene en la lando de Preste Juan de Las Indias aŭ alia regno neniam konata de Ptolomeo nek vizitata de Marko Polo? Kaj se oni respondus al mi, ke la aŭtoroj de tiaj libroj verkis ilin kiel fikcion kaj sekve havas nenian devon zorgi pri veroj aŭ logikoj, mi rebatus, dirante, ke ju pli la fikcio similas al la vero kaj proksimiĝas al la probable, des pli bona kaj loga ĝi ŝajnas. La fikciaj rakontoj devas kongrui kun la menso de siaj legantoj kaj esti elpensitaj tiamaniere, ke, sen la utiligo de evidentaj neebloj kaj eksceso, ili kreu suspenson kaj veku admiron, surprizon, plezuron kaj emocion, tiele, ke intereso kaj kontento povu iri man-en-mane; kaj ĉion ĉi ne kapablos atingi la verkisto, kiu devias de la verŝajno kaj de la imito de la realo, t.e. de la fundamentoj de la perfekta literaturo. Mi ne vidis ankoraŭ kavaliran libron, kies intrigo formus tutan korpon kun ties membroj, tiel, ke la meza membro respondus al la unua, kaj la lasta al la unua kaj al la meza; male, ili prezentas tiom da membroj, ke, ŝajne, la aŭtoroj pli intencis fari ĥimeron aŭ monstron ol figuron proporcian. Krome, ilia stilo estas aspra, iliaj aventuroj nekredeblaj, iliaj am-aferoj lascivaj, iliaj komplimentoj ridindaj, iliaj bataloj longaj, iliaj konversacioj stultaj, iliaj vilaĝoj ekstravagancaj, kaj, fine, ili montras sin tiel mankaj je arto kaj talento, ke ili meritas esti ekzilitaj el la kristanaj regnoj, kiel aro da sentaŭguloj.

La pastro aŭskultis la kanonikon kun granda atento kaj opiniis lin viro saĝa kaj prava en ties rezonoj; sekve li respondis, ke, tial, ke li havas lian saman opinion kaj sentas lian saman antipation kontraŭ la kavaliraj libroj, li siatempe

oferis al la fajro la multajn volumojn de don Quijote. Poste li menciis sian ekzamenon de la verkoj, kaj kiom da ili li kondamnis bruli aŭ absolvis. La kanoniko multe ridis je tio kaj diris, ke, kvankam li opinias tiel aĉaj tiajn librojn, li trovas en ili ion bonan, nome, la vastan kampon de iliaj temoj, kie talenta viro povus montri sian kapablon, libere uzante la plumon tiel en la priskribo de ŝipo-pereo, tempestoj, renkontiĝoj kaj bataloj, kiel en la pentro de la kuraĝa kapitano kun ties necesaj kvalitoj: prudento por antaŭiĝi al la ruzoj de la malamiko; rapido por agi; kuraĝo por ataki kaj elteni... Krome la aŭtoro povus verki jen pri tragika kaj lamentinda evento, jen pri feliĉa kaj neatendita okazaĵo; ĉi tie pri belega damo, honesta, saĝa kaj pudora; tie pri kristana kavaliro sentima kaj ĝentila; transe pri monstra kaj fanfara barbaro; pretere pri princo kuraĝa, afabla kaj bone edukita... Kaj prezenti ankaŭ la bonon kaj lojalon de vasaloj kune kun la grandanimeco kaj la donema spirito de senjoroj. Li povus montri sin foje astrologo, foje lerta kosmografo, foje muzikisto, foje sperta en la aferoj ŝtataj, kaj eble ne mankus al li la okazo aperi kiel orakolo, se li volus. Li povus fari priskribon de la ruzoj de Ulizo, de la kompatemo de Eneo, de la kuraĝo de Aĥilo, de la misfortunoj de Hektoro, de la perfidoj de Sinon, de la amikeco de Eŭrialo, de la grandanimeco de Aleksandro, de la aŭdaco de Cezaro, de la pardonemo kaj sincero de Trajano, de la fidelo de Zopiro, de la prudento de Katono kaj fine, de la tuto de agoj, kiuj faras eminentulon perfekta, kaj kiujn la verkisto povus atribui al unu sola viro aŭ dividi inter multaj. Kaj se al ĉio ĉi aldoniĝas agrabla stilo kaj inĝenia intrigo plejeble proksima al la vero, la aŭtoro certe teksus ŝtofon el diversaj kaj brilaj fadenoj, kiu, kiam finita, montrus sin tiel bela kaj perfekta, ke ĝi atingus la superan celon de tiaj verkoj, nome, samtempe instrui kaj delecti, kiel mi jam diris. Ĉar, verkante sen observi rigoran ordon, la aŭtoro havas la ŝancon montri sin eposa, lirika tragika aŭ komika, dank' al la partoj kie aplikeblas la dolĉegaj kaj agrablaj artoj de la poezio kaj la

retoriko; ĉar epopeon oni povas verki same en prozo kiel en poezio.

[187] En la epoko de Cervantes, damoj kaj riĉuloj ŝatis parfumi sin per ambro, substanco tre multekosta, kaj impregni per ĝi precipe la vestopecojn el ledo.

[188] Efektive, temas pri unu el la noveloj de Cervantes.

[189] Libro fama siatempe, verkita de Gaspar Gardillo de Villalpando. La ĝusta titolo estas *Summa summularum* (1557), ia traktato pri dialektiko aŭ logiko.

[190] La helenoj nomis la bramanojn de Hindujo «gimnosofistoj», kaj, male al la aserto de don Quijote, ili havis nenian rilaton kun Etiopio.

[191] En ironia senco; oni interpretu: metis pli da konfuzo en la implikon.

[192] Fabeloj el la helena urbo Mileto kie oni inventis ilin plenaj de absurdoj kaj ekstravagancoj.

Ĉapitro 48

Kie la kanoniko plu traktas pri la kavaliraj libroj kaj pri aliaj objektoj indaj je lia scio

—Vi pravas, sinjoro kanoniko —diris la pastro—. Vere, la aŭtoroj de tiaj libroj meritas plej severan riproĉon, ĉar ĝisdate ili verkis ignorante la logikon kaj la principojn de la arto, sub kies gvido ili povintus fami en la prozo, kiel la du princoj de la poezio, greka kaj latina,^[193] famas en la poezio.

—Nu, eĉ mi mem sentis iam la tenton verki kavaliran libron, tenante min je la menciitaj principoj —respondis la kanoniko—. Se konfesi la veron, mi eĉ skribis pli ol cent paĝojn, kaj, por eltrovi, ĉu ilia merito altis, kiel mi pensis, mi montris ilin al personoj kleraj kaj inteligentaj, inklinaj legi ĉi-specan literaturon, kaj ankaŭ al homoj sensciaj, ŝatantaj nur absurdajn fabelojn, kaj mi ricevis ĉies laŭdan aprobon. Malgraŭ tio mi ne daŭrigis la taskon: ĝi ŝajnis al mi fremda al mia profesio, kaj, krome, mi konstatis, ke la personoj stultaj abundas pli ol la saĝaj; kaj tial, ke preferindas la laŭdoj de la eta nombro de la inteligentaj ol la moko de la multaj idiotoj, mi ne volis submeti min al la senvalora juĝo de la triviala plebo, precipa grupo de legantoj de tiaj libroj. Sed mi forlasis la taskon, kaj eĉ la ideon mem fini ĝin, kaŭze de la konkludo, kiun mi eltiris el la dramoj nuntempe ludataj. Se ĝenerale la plej popularaj, tiel la historiaj, kiel la fikciaj, konsistas nur el evidentaj absurdoj kaj galimatioj; se malgraŭ tio, la plebo plezure aŭskultas ilin, kaj opinias ilin bonaj, kio tre distancas de la vero; se la aŭtoroj kaj la aktoroj insistas, ke oni devas verki kaj ludi ilin tiel, ĉar la plebo ne deziras alion, kaj ke la dramoj, kie oni observas la principojn de la arto kaj disvolvas la intrigon laŭ la reguloj, plaĉas nur al kvar kvin personoj,

dum la ceteraj tute ne kapablas kapti ilian signifon; kaj se la aŭtoroj preferas gajni sian panon de la plimulto, ol ricevi la aprobon de la elito, mi pensas, ke la samo okazus al mia libro, t.e. ke, post ol mi klopodus ĝisŝvite en la observado de la diritaj principoj, mi atingus la saman rezulton kiel la najbara tajloro.^[194] Kaj, kvankam mi provis kelkfoje persvadi la aktorojn pri la eraro de ties opinioj kaj pri tio, ke ili allogus pli da publiko kaj gajnus pli da renomo ludante dramojn komponitajn laŭ la reguloj, anstataŭ ekstravagancaj teatraĵoj, ili tiel obstine alkroĉiĝas al siaj ideoj, ke ne ekzistas rezonoj aŭ pruvoj kapablaj movi ilin de ties vidpunkto. Iam mi diris al unu el ĉi obstinuloj: «Ĉu vi ne memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj, oni ludis en Hispanujo tri tragediojn verkitajn de fama poeto ĉi-landa, tiel belajn, ke ili surprizis, plezurigis kaj absorbis la publikon, same la simplan kaj pleban, kiel la kleran kaj eliton, kaj ke nur ĉi tri tragedioj havigis pli da enspezoj al siaj impresarioj ol tridek el la plej bonaj teatraĵoj ek de tiam prezentitaj?». La menciita aktoro respondis: «Via moŝto sendube parolas pri la pecoj *Isabela*, *Filis* kaj *Alejandra*». «Ĝuste pri ili», mi diris. «Memoru, ke oni zorge observis en ili la principojn de la arto, kaj ke tio ne malhelpis ilin sukcesi kaj plaĉi al ĉiuj. Tiel do, kulpas ne la plebo, kiam ĝi petas absurdojn, sed la personoj, kiuj ne volas surscenigi ion diferencon. Nenia absurdo troveblas en *La sendankemo venĝita*, en *Numancia*,^[195] en *Komercisto enamiĝinta*, en *La komplezema rivalino* aŭ en aliaj pecoj verkitaj de talentaj poetoj je ties gloro kaj renomo, kaj ankaŭ je la profito de la aktoroj». Mi aldonis al ĉi tio kelke da argumentoj, kaj ŝajne mi sukcesis iom embarasi lin, sed ne persvadi aŭ konvinki lin, ke li subtenas eraran opinion.

—Sinjoro kanoniko, vi ĵus tuŝis unu punkton —diris tiam la pastro— kiu vekas en mi ian oldan spiton kontraŭ la dramoj nuntempe ludataj; vere, ĝi tiel fortas, kiel mia spito kontraŭ la kavaliraj libroj, ĉar, kvankam kiel Tulio diras, la teatro

devas esti spegulo de la homa vivo, ekzemplo de bonaj moroj kaj figuraĵo de la vero, tamen, la nunaj dramoj montriĝas nur kiel speguloj de absurdoj, ekzemploj de stulto kaj figuraĵoj de lascivo. Ĉu eblas imagi ĉi-rilate ion pli absurdan ol la prezenton, en la unua sceno de la unua akto, de suĉinfano en vindoj, kaj la reaperon, en la dua sceno, de la sama homo, sed jam kiel matura viro kun barbo? Kaj kio pli ridinda ol la surscenigo de kuraĝa oldulo kaj de timoplena junulo, de elokventa lakeo kaj de konsilanta paĝio, de reĝo kampulaĉe kruda kaj de princino inter kuirpotoj? Kion diri pri la ignoro de la unuecoj de tempo kaj loko, se konsideri, ke mi spektis dramon, kies unua akto komenciĝas en Eŭropo, la dua en Azio, la tria finiĝas en Afriko, kaj se ĝi havus kvar aktojn, certe la lasta havus finon en Ameriko, do ĝi ampleksus la kvar partojn de la mondo? Kaj se la imito de la realo konstituas la esencon de la teatro, ĉu eblas, ke ajna persono, eĉ plej neklera, povas kontentiĝi per dramo, kie la agado okazas en la epoko de la reĝo Pepino kaj Karlomagno kaj kie al la protagonisto oni atribuas, ke li eniris en Jerusalemon portante la Krucon, kiel la imperiestro Heraklio, kaj samtempe, ke li konkeris la Sanktan Tombon, kiel Godfredo de Bouillon, kvankam inter la du epokoj ekzistas nekalkulebla nombro da jaroj? Se la dramo baziĝas sur fikcio, kial, ne zorgante pri verŝajneco kaj farante tute nepardoneblajn erarojn, oni enkondukas historiajn faktojn kaj enmiksas incidentojn okazintajn al diversaj personoj en diversaj tempoj? Plej bedaŭrinde, multaj idiotoj opinias, ke ĉi-specaj dramoj perfektas, kaj ke voli ion diferencon estus troa kaj kaprica pretendo.

»Kaj se ni transiras al la religia teatro, kiom da falsaj mirakloj ni trovas tie! Kiom da aferoj apokrifaj kaj fuŝaj: la miraklojn de unu sanktulo oni atribuas al alia! Eĉ en la profanajn pecojn la dramistoj aŭdacas enkonduki miraklojn, sen ia skrupulo, nur ĉar ŝajnas al ili, ke miraklo, aŭ efekta artifiko, kiel ili ĝin nomas, konvenas al la intrigo, por ke la senscia

publiko ĝin admiru kaj venu en pli granda nombro al la ludo. Tia konduto damaĝas la veron kaj la historion kaj hontigas la hispanan talentularon, ĉar la fremduloj opinias nin sensciaj kaj barbaraj, konsiderante la absurdon kaj ekstravagancon de niaj dramoj. Ne estus sufiĉa ekskuzo diri, ke la objekto de la publikaj ludoj de teatraĵoj en bone regata lando konsistas nur en tio, distri per honesta spektaklo la popolon kaj deturni ĝin de la mishumoro kutime naskita de la neniofarado; kaj, tial, ke ajna dramo plenumas tian funkcion, sekve ne gravas, ĉu la pecoj estas bonaj aŭ mavaĵ, kaj ne necesas trudi regulojn al ili, aŭ ordoni al la aŭtoroj kaj aktoroj, ke ili tenu sin obeaj al la ĝustaj leĝoj de la teatro. Al tio mi respondus, ke oni nekompareble pli sukcesus per bonaj dramoj ol per mavaĵ, ĉar la publiko de arte komponita peco spertus la distron de la komikaj partoj, la instruon de la seriozaj, la surprizon de la varioj de la scenoj, la inspiron de la dialogoj, la stimulon de la moralaj ekzemploj, la averton kontraŭ la trompo, la abomenon kontraŭ la fivivo kaj la amon al la virto. Bona dramo devas kaŭzi ĉi efektojn eĉ al la plej senscia kaj vulgar-anima spektanto; kaj estas tute neeble, ke tiela dramo ne distrus, amuzus kaj plaĉus multe pli ol la pliparto de la teatraĵoj nun ludataj, mankaj je la diritaj kvalitoj. Sed pri ĉi stato de la aferoj ne kulpas la poetoj dramistoj, ĉar kelkaj el ili tre bone scias kion ili fuŝas kaj eĉ kion ili devus fari; sed ili asertas, kaj asertas prave, ke, tial, ke la dramoj fariĝis artikloj de komerco, la impresarioj ne aĉetas ilin, se oni ne verkas ilin laŭ la ordinaraj formuloj; sekve la poeto klopodas adaptiĝi al la postuloj de la impresario pagonta lian dramon. La veron de mia aserto pravas la senfina nombro da dramoj verkitaj de unu el la plej grandaj genioj de ĉi regnoj,^[196] kun tielaj gracio kaj ĉarmo, kun verso-tekniko tiel eleganta, kun lingvo tiel modela, kun pensoj tiel profundaj kaj fine kun elokvento tiel riĉa kaj stilo tiel bela, ke la mondo plenas de lia famo; tamen, ĉar li cedis al la preferoj de la impresarioj, ne ĉiuj liaj dramoj, sed nur

kelkaj, atingas la gradon de perfekteco, kiun la arto postulas. Aliaj poetoj verkas ilin tiel senzorge, ke, tuj post la fino de la prezentado, la aktoroj devas forkuri kaj kaŝi sin, pro tio, ke ili timas ricevi punon, kio jam ofte okazis, ĉar ili ludis scenojn ofendajn al princoj, aŭ insultajn al nobelaj familioj. Nu, tiaj malbonoj, kaj eĉ multaj aliaj nun ne menciindaj, ĉesus, se inteligenta kaj sagaca funkciulo ekzamenus en la ĉefurbo la dramojn, antaŭ ol oni ludus ilin, ne nur en Madrid, sed en la tuta Hispanujo, kaj se la aŭtoritatoj de la diversaj lokoj ne permesus la prezentadon de ajna teatraĵo ne akompanata de lia oficiala aprobo subskribita kaj sigelita; tiam, la aktoroj zorgus sendi la dramojn al Madrid, kaj povus ilin ludi sen ia danĝero; de sia flanko, la aŭtoroj klopodus verki kun pli granda atento kaj dediĉiteco, sciante, ke iliajn pecojn rigore ekzamenus kompetentulo. Tiel vidiĝus bonaj dramoj sukcese atingantaj kion oni atendas de ili: ne nur la amuzon de la publiko, sed ankaŭ la prestiĝon de la hispanaj genioj, la profiton kaj sekurecon de la aktoroj kaj la neneceson eventuale ilin puni. Nu, se la sama aŭ alia persono ricevus la oficon ekzameni la nove verkitajn librojn kavalirajn, sendube eldoniĝus kelkaj kun la meritoj dezirataj de via moŝto, riĉigante nian lingvon per la agrabla kaj valora trezoro de la elokvento kaj devigante la oldajn librojn eklipsiĝi sub la brilo de la novaj, kiuj havigus honestan distron, ne nur al la neniofarantoj, sed ankaŭ al la okupataj personoj, ĉar, same kiel oni ne povas teni arkon senĉese streĉita, tiel same la homa naturo ne povas elteni sen ia deca distro.

La kanoniko kaj la pastro alvenis al ĉi punkto de sia konversacio, kiam la barbiro proksimiĝis al ili kaj diris:

—Jen la loko, sinjoro licenciulo, kie, kiel mi antaŭe sciigis, konvenus siesti kaj lasi la bovojn paŝtiĝi. La herbo ĉi tie freŝas kaj abundas.

—La samon mi opinias —respondis la pastro.

Poste, ilian intencon halti li komunikis al la kanoniko, kiu, logita de la bela valo sin montranta al lia vido, decidis akompani ilin. Kaj por ĝui tiel la pejzaĝon, kiel la konversacion de la pastro, kun kies persono li jam komencis simpatii, kaj por koni pli detale la aventurojn de don Quijote, la kanoniko instrukciis al kelkaj el siaj servistoj iri al la gastejo proksime staranta kaj reveni kun viktualio sufiĉa por ĉiuj, tial, ke ankaŭ li decidis siesti en la valo la posttagmezon. Tiam unu el la servistoj respondis, ke la ŝarĝo-mulo certe jam atingis la gastejon, ke ĝi portas sufiĉajn provizojn, kaj ke oni bezonas nenion, krom hordeo.

—Se tiel —diris la kanoniko—, konduku al la gastejo ĉiujn mulojn, kaj revenu de tie kun la ŝarĝo-besto.

Dum ĉio ĉi okazis, Sancho vidis, ke li povus paroli al sia mastro sen la kontinua ĉeesto de la pastro kaj la barbiro, suspektindaj al li, do li proksimiĝis al la kaĝo kaj diris:

—Sinjoro, por faciligi mian konsciencon, mi devas diri la jenon pri via ensorĉo: la du personoj tie kun la vizaĝoj kovritaj estas la pastro kaj la barbiro de nia vilaĝo, kaj mi pensas, ke ili portas vin tiamaniere, ĉar ili sentas envion kontraŭ via moŝto, vidante, kiel vi antaŭis ilin en la plenumo de gloraj faroj. Surbaze de ĉi vero, oni devas pensi, ke vi estas, ne ensorĉita, sed en stato de stuporo kaj idioteco. Pruve de tio, mi faros al vi demandon, kaj se via respondo estos tia, kia mi pensas, vi povos tuŝi per la mano la trompon kaj kompreni, ke vi troviĝas sub nenia sorĉo, sed ke via cerbo lamas.

—Demandu laŭvole, filo Sancho —diris don Quijote—, kaj mi kompleze respondos sen ia rezervo. Rilate tion, ke nin akompanas, kiel vi asertas, niaj samlandanoj kaj konatoj la

pastro kaj la barbiro, certe temas pri ŝajno, do absolute ne kredu, ke ili estas efektive kaj reale la diritaj personoj. Se ili havas tian ŝajnon, kredu kaj komprenu nur, ke miaj ensorcantoj alprenis iliajn figurojn kaj aspektojn, same facile kiel ili povus alpreni ajnan figuron, por ke vi kredu kion vi ĝuste kredas, kaj por ke vi enpaŝu en tian labirinton de konjektoj, ke vi ne trovus la eliron, eĉ se vi disponus la ŝnuron de Teseo.^[197] Certe, ili tiel agis, ankaŭ por ŝanceli mian racion, ke mi ne divenu la kaŭzon de ĉi misfortuno. Nu, se unuflanke vi diras, ke nin akompanas la barbiro kaj la pastro de nia vilaĝo, kaj duaflanke mi vidas min enkaĝigita, kaj scias, ke nur superhomaj fortoj kapablus meti min en kaĝon, kion vi volas ke mi diru aŭ pensu, se ne tion, ke ĉi maniero min ensorcĉi estas la plej stranga el ĉiuj legeblaj en la historioj de la vagantaj kavaliroj kaj ties ensorcĉoj? Tiel do, ne perdu la trankvilon kaj la pacon de via spirito, ĉar, kredu, vi vidas nur ŝajnojn, kaj ili estas tiel same la pastro kaj la barbiro, kiel mi turko. Nun, rilate al tio, ke vi deziras demandi min, jam komencu: mi respondos, se necese, ĝis morgaŭ.

—Min helpu la Sankta Virgulino! —diris Sancho, levante la voĉon—. Ĉu eblas, ke via moŝto havas tiel duran kapon kaj tiel stupan cerbon, ke vi ne komprenas, ke mi diras la puran veron, kaj ke via enkaĝigo kaj via misfortuno ŝuldiĝas pli al malico ol al magio? Nu, malgraŭ ĉio, mi absolute pruvos, ke vi ne estas ensorcĉita; alie, Dio elprenu vin el ĉi tempesto, kaj vi vidu vin inter la brakoj de Dulcinea en la plej neatendita momento!

—Jam finu vian ekzorcadon —diris don Quijote— kaj demandu laŭ via plaĉo. Kiel dirite, mi respondos senrezerve.

—Tion mi deziras. Mi volas, ke vi diru la tutan veron, sen aldoni aŭ depreni ion, kiel decas al la personoj, kiuj, kiel via

moŝto, havas la profesion de la armoj sub la titolo de vagantaj kavaliroj.

—Mi ripetas, ke mi mensogos pri nenio —respondis don Quijote—. Kaj komencu demandi, ĉar vere mi jam lacas de viaj ĵuroj, avertoj kaj ĉirkaŭparoloj.

—Nu, mi estas tute certa pri la bono kaj sincero de mia mastro... Tial, kun la ŝuldata respekto, mi faros al vi la demandon koncernan al ĉi kazo. De la momento, kiam oni metis vin en la kaĝon, kaj sub ensorcô laŭ via opinio, ĉu vi sentis la bezonon fari grandan aŭ etan akvon, kiel oni kutime diras?

—Mi ne komprenas tion pri fari akvon, Sancho. Se vi volas, ke mi precize respondu, esprimu vin pli klare —respondis don Quijote.

—Ĉu eblas, ke via moŝto ne konas la signifon de fari akvon? Nu, en la lernejo, tio estas la unua leciono de la infanetoj. Bone, mi volas diri, ĉu vi sentis la bezonon fari kion ne eblas ne fari?

—Mi komprenas vin, Sancho, fine! Jes, mi sentis ĝin plurfoje; kaj eĉ en ĉi momento; eltiru min el ĉi situacio, ĉar ne ĉio estas pura ĉe mi.

[193] Sendube, aludo al Homero kaj Vergilio.

[194] Parto de proverba esprimo, kiu, kompleta, tekstas: «Kiel la najbara tajloro, kiu donacis la ŝtofon kaj faris la laboron».

[195] Teatraĵo verkita de Cervantes mem.

[[196](#)] Lope de Vega.

[[197](#)] Ironie: la fadeno de Teseo.

Ĉapitro 49

Pri la saĝa konversacio inter Sancho Panza kaj ties mastro don Quijote

—Ha! —ekkriis Sancho—. Jen, mi vin havas! Tion mi deziris aŭdi per mia tuta koro kaj per mia tuta animo. Nu, sinjoro, diru: ĉu vi negus, ke oni kutime diras, kiam iu montriĝas deprimita: «Mi ne scias kio okazas al li; ne manĝas, nek trinkas, nek dormas, nek respondas kongrue, se oni demandas lin, kaj li ŝajnas kvazaŭ ensorĉita»? Ni devas do konkludi, ke se iu ne manĝas, nek dormas, nek faras la aliajn naturajn funkciojn, kiujn mi antaŭe diris, tiam li estas ensorĉita; sed, se li havas tiel bonan aspekton kiel via moŝto, kaj li trinkas, se oni donas al li trinki, kaj manĝas, se li disponas ion manĝeblan, kaj respondas, se demandite, tiam li ne estas sub ensorĉo.

—Vi pravas, Sancho —diris don Quijote—. Sed mi jam avertis vin, ke ekzistas multaj specoj de ensorĉo, kaj sendube unuj anstataŭas aliajn kun la paso de la tempo; eble nuntempe regas determinitaj ensorĉoj, kaj ĉiuj ensorĉitoj devas kondukti same kiel mi, eĉ se antaŭe okazis alie; sekve vanas diskuti aŭ tiri konkludojn kontraŭ la ŝanĝoj trudataj de la tempo. Mi scias kaj certas, ke mi estas sub ensorĉo, kaj tio sufiĉas por la trankviliĝo de mia konscienco, kiu tre suferus, se, opiniante min ne ensorĉita, mi tamen permesus al mi sidi time kaj neniofare en ĉi kaĝo, trompante la esperon de la granda nombro da mizeraj kaj senhelpaj, kiuj atendus mian protekton; kaj eble ili tre bezonas ĝin urĝe kaj en ĉi momento.

—Tamen, mi kredas —diris Sancho—, ke, por plia trankviliĝo de via konscienco, via moŝto devus peni eltiri vin el ĉi karceroj; mi promesas ĉiel helpi vin kaj eĉ liberigi vin, ke vi povu grimpi sur Rocinante, kiu aspektas tiel triste kaj melankolie, ke ankaŭ ĝi ŝajnas ensorĉita; poste ni irus denove provi nian sorton en novaj aventuroj, kaj, se ni ne sukcesus, ni ĉiam havus la eblon reveni al ĉi kaĝo, kie, je mia parolo de bona kaj lojala ŝildisto, mi sidus enfermite apud vi, se via moŝto estus tiel missorta, kaj mi tiel stulta, ke ni ne povus sukcese efektiviĝi kion mi proponas.

—Mi volonte faros kion vi diras, frato Sancho —respondis don Quijote—. Kiam vi vidos la okazon liberigi min, mi obeos vin plene kaj absolute; sed vi konstatos, Sancho, ke vi trompiĝas rilate al la naturo de mia misfortuno.

La vaganta kavaliro kaj la misvaganta ŝildisto plu babilis tiel, ĝis ili alvenis al la loko, kie, jam surpiede, atendis la pastro, la barbiro kaj la kanoniko. La ĉaristo eljungis la bovojn el la veturilo kaj lasis ilin paŝtiĝi laŭvole sur la verda kaj paca loko, de kies freŝo logiĝis, ne nur la personoj sorĉitaj, kiel don Quijote, sed ankaŭ la inteligentaj kaj saĝaj, kiel la ŝildisto. Sancho petis de la pastro, ke li permesu lian sinjoron resti iom da tempo ekster la kaĝo, ĉar alie ĝi ne montriĝus tiel pura, kiel postulis la respekto ŝuldata al tia kavaliro, kiel lia mastro. La pastro bone komprenis kaj diris, ke tre volonte li konsentus, se li ne timus, ke don Quijote, vidante sin libera kaj lasante sin gvidi de siaj impulsoj, fuĝus al iu loko, kie oni neniam povus lin trovi.

—Mi garantias, ke li ne fuĝos —respondis Sancho.

—Ankaŭ mi, plene kaj absolute —diris la kanoniko—. Des pli, se li donus sian parolon de kavaliro, ke li ne forlasos nin.

—Mi donas mian parolon —promesis don Quijote—. Des pli, ke ensorĉito kiel mi ne havas la liberon disponi pri sia propra persono, ĉar lia ensorĉinto povas laŭdezire teni lin senmova tricent jarojn en la sama loko. Kaj se li fuĝus oni igus lin reveni fluge tra la aero.

Li aldonis, ke, sekve, oni povus sen ia danĝero liberigi lin, kaj eĉ kun profito por ĉiuj, ĉar, alie, aliaj nazoj ofendiĝus, se ili ne retirus sin je ioma distanco.

La kanoniko prenis lin je unu mano, kvankam li tenis ilin ambaŭ kunligitaj, kaj, sub la garantio de lia parolo, oni elkaĝigis lin je lia ega kontento. Unue li streĉis sian tutan korpon, poste iris al Rocinante, dufoje polmofrapis al ĝi sur la gropon kaj diris:

—Floro kaj spegulo de la ĉevaloj, mi fidas ankoraŭ je Dio kaj ties benata Patrino, ke baldaŭ ni vidos nin, kiel ni du deziras: vi, sub via mastro; kaj mi, sur via dorso, ekzercante min en la ofico, por kies plenumo Dio metis min en la mondon.

Tion dirinte, don Quijote apartiĝis kun Sancho al distanca loko, de kie li revenis senbalasta, kaj pli decidita fari kion lia ŝildisto ordonus al li.

Lin rigardante, la kanoniko miris je lia stranga frenezo, tial, ke en siaj konversacioj kaj respondoj li rivelis tre bonan menson, kaj, kiel jam dirite, perdis la saĝon, nur kiam temis pri kavaliraĵoj.

Post ol la tuta grupo sidiĝis sur la verda herbo, atendante la alvenon de la provianto de la kanoniko, ĉi lasta, puŝite de kompatato, diris al don Quijote:

—Ĉu eblas, sinjoro hidalgo, ke la sengustaj kaj ridindaj libroj kavaliraj kapablis tiel ŝanceli al vi la cerbon, ke vi kredas je via ensorĉo kaj je aliaj historioj de la sama speco, kvankam

ili tiel distancas de la realo, kiel la mensogo de la vero? Kiel eblas, ke povas funkcii homa cerbo kapabla akcepti la ekziston de la nekalkulebla nombro de Amadisoj kaj la senorda kaj konfuza amaso de tiom da famaj kavaliroj, de tiom da imperiestroj de Trebizondo, de tiom da prodoj nomitaj Felixmarte de Hirkanio, de tiom da palefrenoj, de tiom da vagantaj puceloj, de tiom da drakoj, monstroj kaj gigantoj, de tiom da fantastaj aventuroj, de tiom da ensorcôj, bataloj kaj ferocaj dueloj, de tiom da paradaj roboj, de tiom da princinoj enamiĝintaj, de tiom da ŝildistoj grafoj, de tiom da graciaj nanoj, de tiom da amaj biletoj, komplimentoj kaj bravaj virinoj, kaj fine, de tiom da absurdoj sidantaj en la kavaliraj libroj? Mi devas konfesi, ke, kiam mi legas ilin, ili iel plezurigas min, se mi ne atentis, ke ili konsistas nur el mensogoj kaj lascivoj; sed, kiam mi denove ekkonscias ilian veran naturon, mi pafas kontraŭ la muron la plej bonan el tiaj libroj, kaj eĉ ĵetus ĝin al la flamoj, se mi havus fajron proksima; ili ja meritas ĉi punon, ĉar ili estas fremdaj al la komuna saĝo, falsaj kaj mensogaj, diskrias novajn doktrinojn kaj viv-manierojn, kaj movas la menscian plebon kredi veraj tiom da absurdoj. Ĉi libroj eĉ perturbas la menscon de prudentaj hidalgoj de moŝta nasko, kion oni klare vidas ĉe via moŝto, falinta en tian staton, ke necesas enfermi vin en kaĝon kaj vin veturigi en bovo-ĉaro, kvazaŭ temus pri tigro aŭ leono transportata de urbo al urbo kaj elmontrata por mono. Nu, sinjoro don Quijote, kompatu vin mem, revenu en la sinon de la sana racio kaj lernu uzi la multan talenton al vi donacitan de la ĉielo, okupante vin per aliaj libroj pli profitaj al via konscienco kaj pli utilaj al via honoro. Kaj se, malgraŭe, vi sekvus vian inklinon legi librojn pri heroaĵoj kaj kavaliroj, legu en la Biblio la Libron de la Juĝistoj, kie troveblas veroj grandiozaj kaj faroj tiel aŭtentaj kiel kuraĝaj. Luzitania havis sian Viriato; Romo sian Cezaro; Kartago sian Anibalo; Grekio sian Aleksandro, Kastilio sian grafon Fernán González; Valencio sian Cid; Andaluzio sian Gonzalo Fernández; Extremadura sian Diego García de

Paredes; Jerez sian García Pérez de Vargas; Toledo sian Garcilaso; Sevilla sian don Manuel de León; kaj la rakonto de iliaj brilaj faroj povas distri, instrui, delecti kaj surprizi eĉ la personon de plej granda inteligento. Jes, mia kara sinjoro don Quijote, ĉi rakontoj estas indaj je via atento, kaj, legante ilin, vi akiros historian scion, amos la virton, observos la bonon, poluros viajn kutimojn kaj kondutos brave kaj kuraĝe, ne troaŭdace kaj temerare; kaj tio ĉi je la honoro de Dio, je via propra profito kaj je la gloro de La Mancha, de kie, laŭ mia scio, devenas via familio kaj origino.

Don Quijote atentege aŭskultis ĝisfine la argumentadon de la kanoniko, fikse rigardis lin kelkan tempon, kaj respondis:

—Ŝajnas, sinjoro hidalgo, ke viaj paroloj celis persvadi min, ke en la mondo ne ekzistas vagantaj kavaliroj, ke la libroj kavaliraj estas falsaj, mensogaj, damaĝaj kaj senprofitaj al la regno, ke mi aĉe faris legante ilin, pli aĉe kredante ilin, kaj plej aĉe imitante ilin de la momento, kiam mi fordonis min al la tre rigora profesio de la kavalirismo, kiun ili instruas. Krome, vi asertis, ke ne ekzistis en la mondo Amadís de Gaŭlio, nek Amadís de Grekujo, nek la ceteraj kavaliroj, de kies historio la libroj plenas.

—Vi esprimas mian opinion ĝuste tiel, kiel mi ĝin proklamis —diris la kanoniko.

—Via moŝto aldonis ankaŭ —daŭrigis don Quijote—, ke tiaj libroj faris al mi multe da damaĝo, ĉar ili renversis mian cerbon kaj kaŭzis mian enkaĝigon, kaj ke mi devus korekti mian inklinon kaj ŝanĝi miajn legaĵojn por aliaj libroj pli veraj, pli instruaj kaj pli distraj.

—Efektive —diris la kanoniko.

—Nu, laŭ mia opinio —aldonis don Quijote—, ĝuste via moŝto estas sencerba kaj ensorcita, tial, ke vi vin dediĉas

blasfemadi kontraŭ unu institucio tiom akceptita kiel vera en la tuta mondo, kaj tiom aŭtenta, ke ajna persono tion neganta, kiel via moŝto, meritis la saman punon, kiun, laŭ viaj diroj, aplikas al la libroj, kiam ili ne plaĉas al vi. Voli persvadi, ke neniam ekzistis en la mondo Amadís kaj la ceteraj kavaliroj aventuristoj, de kies faroj plenas la historioj, egalus aserti, ke la suno ne brilas, ke la glacio ne fridas, aŭ ke la tero ne donas fruktojn. Kia persono povas loĝi en la mondo, kapabla konvinki alian, ke ne veras la historioj de la princino Floripes kaj Guy de Burgonjo, aŭ la aventuro de Fierabrás ĉe la ponto de Mantible, okazinta en la epoko de Karlomagno, kaj tiel vera, mi ĵuras, kiel la fakto, ke nun estas hela tago? Kaj se tio konsistas el mensogoj, oni devus konkludi, ke ankaŭ ne ekzistis Hektoro, nek Aĥilo, nek la milito de Trojo, nek la Dek du Paruloj de Francujo, nek la angla reĝo Arturo, kiu, transformita en korvon, iras tra la mondo, kaj kies regno atendas ĉiumomente lian revenon. Certe oni eĉ kuraĝos opinii falsaj la historion de Guarino Mezquino, kaj la serĉadon de la Sankta Gralo, kaj apokrifaj la am-aferon de don Tristano kun la reĝino Izolda, kaj de Ginevra kun Lanceloto, kvankam kelkaj personoj preskaŭ memoras esti vidintaj duenjon Quintaŝona, la plej bona vin-verŝistino de Granda Britujo. Ĉi-rilate mi memoras, ke mia patroflanka avino diris, kiam ŝi vidis duenjon kun impona kufo: «Rigardu, nepo, ŝi ŝajnas duenjo Quintaŝona», kaj el tio mi konkludis, ke ŝi certe konis la duenjon aŭ, almenaŭ, vidis unu el ŝiaj portretoj. Nu, kiu povus negi la veron de la historio de Pierre kaj la linda Magalona, se konsideri, ke oni vidas eĉ nuntempe, en la reĝa arsenalo, la lignonajlon uzatan de la brava Pierre por direkti la lignan ĉevalon, kiu portis lin fluge tra la aero? Ĉi lignonajlo estas iom pli granda ol la timono de ĉaro, kaj apud ĝi montriĝas la selo de la ĉevalo Babiĉa. Krome, en Roncesvalles oni vidas la kornon de Rolando, grandan kiel trabo. El tio oni konkludas, ke ekzistas la Dek du Paruloj, ke ekzistis Pierre, ke ekzistis Cid, kaj ke ekzistis aliaj similaj kavaliroj irantaj, kiel oni diras, al

siaj aventuroj. Se tion oni ne kredas, oni eĉ deklaras ankaŭ, ke ne veras, ke la brava luzitano Juan de Merlo iris al Burgonjo kaj duelis en la urbo Arras kontraŭ la fama senjoro de Charny nomita moŝto Pierre, kaj poste en la urbo Bazelo kontraŭ moŝto Enrique de Renestán, kaj eliris sin el ambaŭ entreprenoj triumfa kaj plena de gloro; oni negos ankaŭ la aventurojn kaj defiojn plenumitajn, en la sama Burgonjo, de la kuraĝaj hispanoj Pedro Barba kaj Gutierre Quijada (de kies familio mi devenas laŭ rekta linio vira), kiuj venkis la filojn de la grafo de Sankta Paolo. Ĉu oni same obstine deklaras, ke don Fernando de Guevara ne iris serĉe al aventuroj en Germanujon, kie li duelis kontraŭ senjoro Jorge, kavaliro de la domo de la grafo de Aŭstrio? Ĉu estis fikciaj la turniroj de Suero de Quiñones del Paso, la entreprenoj de Luis de Falces kontraŭ don Gonzalo de Guzmán, kavaliro kastilia, kaj multaj aliaj prodaĵoj plenumitaj de kristanaj kavaliroj landaj kaj eksterlandaj, kaj tiel veraj kaj aŭtentaj, mi ripetas, ke mankus la racio kaj la logiko al persono neganta ĉion ĉi?

La kanoniko mire aŭskultis ĉi mikson de veroj kaj mensogoj, kaj surpriziĝis de la granda scio de don Quijote rilate al la aferoj de la vaganta kavalirismo. Li do respondis:

—Mi ne povas ne konsenti, sinjoro don Quijote, ke io estas vera en viaj diroj, precipe en tio koncerna al la vagantaj kavaliroj hispanaj. Mi koncedas ankaŭ, ke ekzistis la Dek du Paruloj de Francujo, sed mi ne kredas, ke ili faris ĉion, kion rakontas pri ili la ĉefepiskopo Turpin. Efektive, temis pri kavaliroj elektitaj de la reĝoj de Francujo, kaj oni nomis ilin paruloj, ĉar ili egalas, unuj al la aliaj laŭ rango, kuraĝo, kaj kvalitoj, aŭ, almenaŭ, ili devus egali, ĉar ili apartenis al speco de religia ordeno, kiel la nunaj de Santiago aŭ Calatrava, pri kies membroj oni antaŭsupozas, ke ili devas, aŭ devus, esti, kavaliroj, honorindaj, kuraĝaj kaj de moŝta nasko; kaj same kiel nuntempe oni diras «kavaliro de San Juan» aŭ «kavaliro de Alcántara», en la pasinta epoko oni

diris «kavaliro de la Dek du Paruloj», ĉar oni elektis ilin, dek du egalajn, por ĉi ordeno religia. Koncerne al Cid, li ja ekzistis, same kiel Bernardo del Carpio, sed pri kelkaj heroaĵoj atribuitaj al ili oni devas tre dubi. Pri la lignonajlo de grafo Pierre kaj pri tio, ke ĝi staras apud la selo de Babiaca en la reĝa arsenalo, mi devas konfesi, ke mi estas tiel senscia aŭ tiel miopa, ke, kvankam, mi vidis la selon, mi neniam rimarkis la najlon, malgraŭ ke, laŭ vi, ĝi montriĝas tre granda.

—Tamen, ĝi sidas tie, certe —respondis don Quijote—. Kaj jen ankoraŭ io: oni diras, ke oni ĝin gardas en leda ingo, ke ĝi ne putru.

—Eble —diris la kanoniko—, sed mi ĵuras je miaj sanktaj ordinoj, ke mi ne memoras esti ĝin vidinta; sed, eĉ se mi koncedus, ke la najlo tie sidas, mi ne devontigus min kredi je tiom da Amadisoj aŭ je la svarmoj de la kavaliroj, kies historion oni rakontas. Kaj ne ekzistas motivo, por ke viro kiel via moŝto, honorinda kaj dotita per tiel bona talento, kreu veraj tiom da ekstravagancaj absurdoj troveblaj en la ridindaj libroj kavaliraj.

Ĉapitro 50

Pri la saĝaj diskutoj inter don Quijote kaj la kanoniko kaj pri aliaj aferoj

—Ne ŝercu! —respondis don Quijote—. La libroj eldonitaj kun reĝa permeso kaj kun aprobo de la cenzuro kaj legataj, kun tiel ĝenerala plaĉo kaj aplaŭdo, de la maturaj kaj de la junaj, de la paŭperaj kaj de la riĉaj, de la kleraj kaj de la sensciaj, de la plebaj kaj de la altrangaj, kaj resume, de personoj de ĉia stato kaj pozicio, ĉu povus esti nuraj mensogoj kaj samtempe montriĝi tiel multe veraj, se konsideri, ke en ili oni mencias la patron kaj patrinon, la familion, la nacion, kaj la aĝon de unu aŭ alia kavaliro, indikante la epokon kaj lokon de ties faroj, detalon post detalo kaj tagon post tago? Via moŝto silentu kaj ne plu blasfemadu tiele; kredis min, sekvu mian konsilon, kaj, kiel saĝa persono, legu la librojn kaj vi vidos, kiel multe ili delectos vin. Diru, ĉu povus ekzisti, por ekzemplo, io pli agrabla ol vidi ĉi-momente antaŭ niaj okuloj grandan lagon el bolanta peĉo, kie naĝus multaj serpentoj, kolubroj kaj lacertoj, kaj multaj specoj de ferocaj kaj teruraj bestoj, kaj tiam aŭdi plendegan voĉon diri el la mezo de la lago: «Vi, nekonata kavaliro rigardanta ĉi timigan lagon: se vi deziras atingi la trezoron kaŝitan sub ĉi nigraj akvoj, montru la kuraĝon de via forta brusto kaj ĵetu vin en la mezon de la obskuraj kaj brulaj ondoj; alie vi ne meritos vidi la nedireblajn mirindaĵojn kaŝitajn en la sep kasteloj de la sep feinoj loĝantaj sub ĉi nigra akvo». La kavaliro, apenaŭ aŭdinte ĉi timigan voĉon forgesas sin mem, absolute ne pensas kian danĝeron li alfrontos, kaj, eĉ sen demeti la pezan armaĵon, rekomendante sin al Dio kaj al sia damo, sin ĵetas en la mezon de la bolanta lago; kaj kiam li ne komprenas, nek scias, kien li trafos, li subite troviĝas inter

florantaj kampoj nekompareble pli belaj ol la Elizeaj. Ŝajnas al li, ke la ĉielo pli diafanas tie, kaj ke la suno radias novan lumon; al liaj okuloj montriĝas paca bosketo el tiel verdaj kaj foli-riĉaj arboj, ke ĝia verdo ĉarmas la vidon, dum regalas la aŭdon la dolĉa kaj nelernita kanto de nekalkuleblaj kaj buntaj birdetoj flirtantaj inter la branĉoj interplektitaj. Tie li renkontas rojon, kies freŝa akvo, simila al likva kristalo, fluas sur fajna sablo kaj blankaj ŝtonetoj, kiuj ŝajnas oro disŝutita kaj plej puraj perloj. Ĉi tie li vidas elegantan fontanon el plurkolora jaspo kaj glata marmoro. Transe li admiras alian, rustike ornamitan, kie etaj konkoj mitulaj, kombinitaj en senorda ordo kun torditaj domoj blankaj kaj flavaj de helikoj, miksiĝas kun pecoj de brila kristalo kaj kun falsaj smeraldoj, kaj kreas tian efekton de vario, ke ĉi tie la arto, imitante la naturon, ŝajnas eĉ superi ĝin. Pretere, subite montriĝas al li forta kastelo aŭ pompa alkazaro kun remparoj el solida oro, kreneloj el diamantoj, pordoj el topazoj, kaj ĝi estas tiel mirinde farita, ke, kvankam ĝiaj konstru-materialoj konsistas el diamanto, karbunkoloj, rubenoj, perloj, oro kaj smeraldoj, ĝia arkitekturo estas eĉ pli valora. Kaj admirinte ĉion ĉi, ĉu ne admirindus vidi krome, ke tra la pordo de la kastelo eliras granda nombro da puceloj en tiel paradaj kaj riĉaj kostumoj, ke, se mi priskribus ilin detale, kiel la historioj, mi neniam finus? Poste la ŝajne pli grava pucelo ekprenas je la mano la kuraĝan kavaliron, kiu antaŭe ĵetis sin en la bolantan lagon, kaj, sen paroli, gvidas lin en la internon de la pompa alkazaro aŭ kastelo, kie oni senvestigas lin, ĝis li vidiĝas tiel nuda, kiel en la momento de lia elpuŝo el la ventro patrina; oni banas lin en tepida akvo, ŝmiras lin per aromaj esencoj kaj surmetas al li parfumitan ĉemizon el plej delikata tulo; alia pucelo ĵetas al li sur la ŝultrojn ian mantelon, kiu valoras, laŭdire, unu urbon kaj eĉ pli. Ĉu ne bele, kiam oni rakontas, ke poste oni lin kondukas al alia salono, kie staras tabloj tiel riĉe primetitaj, ke li mutiĝas de miro? Ĉu ne bele, kiam oni verŝas al li sur la manojn akvon distilitan el ambro kaj el bonodoraj floroj, kaj igas lin sidiĝi sur ebura seĝo, kaj

ĉiuj puceloj lin servas en mirinda silento? Ĉu ne bele kiam oni surtabligas al li tiom da gustumindaj pladoj, tiel bone preparataj, ke la apetito hezitas kien direkti la manon? Ĉu ne agrable, kiam li aŭskultas muzikon dum la manĝado kaj ne scias, de kie venas la melodio, kaj kiu ĝin interpretas? Ĉu ne bele, ke post ol finiĝas la manĝo kaj oni prilevas la tablon, la kavaliro, retroklinita sur la seĝo, ripozas, kaj dume eble pikumas al si la dentojn, laŭ sia kutimo, kaj tiam neatendite eniras tra la pordo de la salono alia pucelo multe pli bela ol la antaŭaj, kaj sidiĝas apud la kavaliro, kaj komencas rakonti al li pri la kastelo, pri tio, ke ŝi estas ensorcita, kaj pri aliaj aferoj, kiuj surprizas la kavaliro kaj ĉarmas la legantojn de la rakonto?

»Mi ne plu insistos ĉi-rilate, ĉar el miaj vortoj oni povas konkludi, ke ajna parto de ajna libro kavalira estas motivo de miro kaj plezuro al la legantoj. Kredu min, sinjoro, legu ĉi librojn, kiel dirite; vi vidos, ke ili forpelos de vi la melankolion, se vi ĝin havas, kaj plibonigos vian humoron, se ĝi acidas. Rilate al mi, mi povas diri, ke, de kiam mi profesias en la kavalirismo, mi estas kuraĝa, afabla, ĝentila, sindona, bone edukita, aŭdaca, molkora kaj pacienca, kaj eltenas la rigorojn de duraj entreprenoj, kaptitecoj kaj ensorcĵoj; kaj, kvankam de tre mallonge oni tenas min enfermita en ĉi kaĝo, kvazaŭ frenezulon, mi pensas, ke per la kuraĝo de mia brako, se la ĉielo min favoros, kaj se la fato ne oponos, mi vidos min, post nur kelkaj tagoj, reĝo de ia regno, kie mi povos montri la sindonon kaj dankemon de mia koro, ĉar, je mia fido, sinjoro, al senhava homo mankas la eblo praktiki la virton de la malavaro favore al ajna persono, eĉ se tian virton li posedas en la plej alta grado. Kaj la dankemo limigita al la nura intenco estas io tiel morta, kiel la fido sen bonaj agoj. Tial mi dezirus havi baldaŭ la ŝancon kroni min imperiestro, ke mi povu montri mian deziron fari bonon al miaj amikoj, precipe al ĉi povra Sancho Panza, mia ŝildisto, la plej granda bonkorulo de ĉi mondo; mi ŝatus doni

al li graflandon delonge promesitan, kvankam mi timas, ke li ne havus kapablon sufiĉan por regi sian ŝtaton.

Sancho, aŭskultinte nur ĉi lastajn vortojn de sia mastro, diris:

—Surprenu, sinjoro don Quijote, la entreprenon havigi al mi la graflandon tiel ofte promesatan de via moŝto kaj tiel longe atendatan de mi. Mi certigas vin, ke mi estos sufiĉe lerta por ĝin mastrumi, kaj, eĉ se mankus al mi kapablo, mi aŭdis, ke ekzistas en la mondo, viroj, kiuj lue prenas la regnon de senjoro, donas al li ĉiujare ian farmopagon, kaj dum ili sin okupas regi, la senjoro ripozas kuŝe-dorme, ĝuante la renton, kaj zorgas pri nenio alia. Mi faros same, ĉion aranĝos rapide, kaj ĝuos la renton larĝe kaj lukse, kiel princo... kaj ĉiu vivu laŭpove.

—Tio, frato Sancho —diris la kanoniko—, koncernas la ĝuon de la rento, sed rilate al administradon de la justico necesas, ke la mastro de la regno sin okupu pri ĝi, kio postulas kapablon, prudenton kaj precipe honestan intencon fari bonon. Se ĉi intenco mankas jam de la komenco, ĉio fiaskos en la mezo kaj en la fino; tial, plaĉas al Dio helpi la bonan intencon de la simplanimaj kaj konfuzi la malicon de la kleraj.

—Mi komprenas nenion pri tiaj filozofioj —respondis Sancho Panza—, sed mi certas, ke tuj kiam mi disponus la graflandon, mi scius ĝin mastrumi: ĉar mi havas tiom da animo, kiel alia persono, tiom da korpo, kiel la plej korpulenta, kaj estos tiel bona reĝo en mia ŝtato, kiel ajna reĝo en la sia; en mia rolo de reĝo mi farus laŭplaĉe; kaj farante laŭplaĉe, mi kontentus; kaj, kiam oni kontentas, nenion kroman oni deziras; kaj dezirante nenion plian, nu, ĉio perfektas. Venu do la regno al mi; adiaŭ kaj ĝis la revido, kiel diris unu blindulo al alia blindulo.

—Tiaj filozofioj, kiel vi diras, Sancho, ne ŝajnas mavaj — respondis la kanoniko—. Sed, malgraŭe, oni povus diri multon ankoraŭ pri ĉi afero de la graflandoj.

—Mi ne scias, ke io kroma direndas —intervenis don Quijote—. Ĉi-rilate mi lasas min gvidi de multaj kaj diversaj ekzemploj de kavaliroj de mia profesio, kiuj reciprokante la lojalajn kaj gravajn servojn de siaj ŝildistoj, premie faris ilin absolutaj senjoroj de urboj kaj insuloj; kelkaj ŝildistoj akumulis tiom da meritoj, ke ili eĉ atingis la rangon de reĝo. Sed, kial mi traktas tiel longe ĉi aferon, se ni havas la nekompareblan ekzemplon de la granda kaj neniam sufiĉe laŭdata Amadís de Gaŭlio, kiu faris sian ŝildiston grafo de la insulo Firme? Do mi povas sen ia skrupulo de konscienco fari Sanchon grafo, tial, ke li estas unu el la plej bonaj ŝildistoj iam servintaj vaganta kavaliron.

La kanoniko miris je la logikaj absurdoj (se la absurdoj povas havi logikon) diritaj de don Quijote, je lia maniero priskribi la aventuron de la Kavaliro de la Lago, kaj je lia mensa ŝanceliĝo kaŭzita de la legado de la fikciaj libroj kavaliraj. Kaj fine, li miris je la stulto de Sancho, ĉiam pensanta pri la graflando promesita de lia mastro.

Ĉe tio revenis la servistoj de la kanoniko irintaj al la gastejo preni la ŝarĝomulon, etendis sur la freŝa herbo tapiŝon, ke ĝi taŭgu kiel tablo, ĉiuj sidiĝis en la ombro de kelkaj arboj kaj komencis manĝi tie, por ke la ĉaristo, kiel dirite, profitu de la paŝtaĵo. Nu, ili manĝis ankoraŭ, kiam subite forta bruo kaj la sono de tintilo aŭdiĝis inter kratagoj kaj densaj veproj proksime starantaj; samtempe oni vidis elpaŝi el inter la arbustoj belan kaprinon kun la haŭto punktita de nigro, blanko kaj grizo; ŝin sekvis la kapristo, kriante kaj parolante al ŝi en sia stilo, ke ŝi haltu kaj revenu al la grego. Sed la fuĝanta kaprino treme kaj terurite kuris ĝis la kompanio, kvazaŭ serĉante ĝian protekton, kaj tie ŝi haltis. Alvenis la

kapristo, ekprenis ŝin je la kornoj kaj diris, kvazaŭ ŝi kapablus kompreni kaj rezoni:

—Ha, sovaĝa, sovaĝa! Vi kaj via kolormakula haŭto! Kiel preta elkuri vi montriĝas nuntempe! Kiaj lupoj vin teruras, filino? Ĉu vi ne volas diri kio okazas al vi, linda? Ne malfacile scii... vi estas ino kaj ne povas resti trankvila. La diablo prenu vin kun via humoro kaj kun la virinoj, kies karakteron vi alprenas! Revenu, amikino, revenu, ĉar vi sentos vin, se ne kontenta, almenaŭ sekura en via stalo kaj kun viaj kompaninoj. Se vi, kiu devas gvidi kaj gardi ilin, tiel devias kaj perdas la vojon, kio okazos do al ili?

La vortoj de la kapristo amuzis la kompanion, precipe la kanonikon, kiu diris al li:

—Je via vivo, frato, trankviliĝu, ne volu tiel rapide peli ĉi kaprinon en la gregon, ĉar pro tio, ke ŝi estas ino, kiel vi diras, ŝi obeos sian naturan instinkton spite al viaj klopodoj deteni ŝin. Prenu ĉi iomon da manĝo, trinku glason, via ĉagreno pasos kaj dume la kaprino ripozos.

Tion dirante, la kanoniko proponis al li lumbaĵon de frida kuniklo sur la pinto de tranĉilo. La kapristo ĝin prenis, dankis lin, trankviliĝis kaj diris:

—Mi ne volus, ke viaj moŝtoj prenis min por idioto, tial, ke mi parolis al ĉi besto kvazaŭ al persono; efektive, miaj diroj povis ŝajni al vi iom strangaj, sed mi ne estas tiel simpla kampulo, ke mi ne scias kiel oni devas paroli al la personoj, kaj al la bestoj.

—Mi kredas vin —diris la pastro—, ĉar mi scias laŭ propra sperto, ke la montoj naskas klerulojn, kaj ke la paŝtistaj kabanaj entenas filozofojn.

—Almenaŭ, sinjoro —respondis la kapristo—, en ili troviĝas homoj riĉaj je sperto, kaj por ke vi kedu ĉi veron kaj povu ĝin tuŝi per la mano, mi petus vin doni al mi iom da atento, se mi ne timus tedi vin kaj ŝajni sintruda, ĉar neinvitita, kaj mi renkontus veran historion, kiu konfirmus la aserton de ĉi sinjoro —kaj li montris la pastron— kaj la mian.

—Konsiderante, ke ĉi afero havas mi ne scias kian nuancon de aventuro kavalira, de mia flanko mi vin aŭskultos tre volonte, frato —respondis don Quijote—. Kaj same faros ĉi sinjoroj, ĉar saĝaj kaj inklinaj al novaĵoj kuriozaj, distraj kaj suspensaj, al kiuj sendube similas via historio. Komencu do, amiko: ni aŭskultas.

—Ne enkalkulu min —diris Sancho—, ĉar mi foriras kun ĉi pasteĉo al la rojo, kie mi pensas ŝtopi al mi la stomakon por tri tagoj. Mi aŭdis diri al mia sinjoro don Quijote, ke la ŝildisto de vaganta kavaliro devas, kiam prezentiĝas la okazo, manĝi ĝiskreve, se konsideri, ke ili povas facile perdi la vojon en ia bosko tiel densa, ke ili ne sukcesus trovi la eliron dum ses tutaj tagoj; kaj se oni ne havas la ventron plena, oni riskas resti tie, kio ofte okazas, ĝis oni turniĝas en mumian karnon.

—Vi pravas Sancho —respondis don Quijote—. Iru kien vi volas kaj manĝu laŭpove. Rilate al mi, mi jam manĝis sufiĉe, kaj mankas nur nutri la spiriton, kion mi faros aŭskultante la historion de ĉi bonulo.

—Ni ĉiuj nutros same nian spiriton —diris la kanoniko, kaj petis la kapriston komenci la promesitan rakonton.

La kapristo donis du manfrapojn sur la dorson de la kaprino, kiun li tenis je la kornoj, kaj diris al ŝi:

—Kuŝiĝu apud mi, kolormakula, ni havos sufiĉan tempon, ĝis ni revenos al la stalo.

Ŝajne la kaprino lin komprenis, ĉar, kiam ŝia mastro sidiĝis, ankaŭ ŝi kuŝiĝis kun multa flegmo apud li, kaj rigardis lian vizaĝon, kvazaŭ ŝi pretus atenti lian historion. Kaj la kapristo ĝin komencis jene:

Ĉapitro 51

Traktas pri la historio rakontita de la kapristo al la
akompanantoj de don Quijote

—Naŭ mejlojn for de ĉi valo, sidas vilaĝo eta, sed el la plej riĉaj de la distrikto. Tie loĝis farmisto tiel konsiderata, ke, kvankam la konsideroj ĉiam akompanas la riĉon, oni pli estimis lin pro lia virto ol pro lia granda havo. Sed, laŭ liaj diroj, lin feliĉigis la fakto, ke li havis filinon tiel ekstreme belan, saĝan, spritan kaj virtan, ke la personoj ŝin konantaj mire admiris la eksterordinarajn kvalitojn, kiujn ŝi ricevis de la ĉielo kaj de la naturo. Ŝi belis jam en sia infaneco, ŝia belo ĉiam kreskis, kaj en la aĝo de dek ses jaroj ŝi estis supermezure rava. La famo pri ŝia ĉarmo baldaŭ etendiĝis ĝis foraj urboj, invadis la salonojn de la reĝaj palacoj, trafis la orelon de multaj specoj de personoj, kiuj venis de ĉie por kontempli ŝin kiel raraĵon aŭ kiel miraklan figuron. Ŝia patro zorge ŝin gardis, kaj ŝi gardis sin mem: ĉar ne ekzistas seruroj, rigliloj aŭ baroj kapablaj gardi pucelon pli efike ol ŝia propra pudoro. La riĉo de la patro kaj la belo de la filino movis multajn virojn, tiel de la vilaĝo kiel de aliaj urboj, peti ŝian manon; sed la patro, al kies aŭtoritato ekskluzive apartenis disponi pri tiel riĉa juvelo, tre perpleksis, nedecida elekti por sia filino unu el ŝiaj nekalkuleblaj kaj trudiĝemaj svatiĝantoj. Nu, inter la multaj, kiuj aspiris ŝin, ankaŭ mi troviĝis kaj havis grandan esperon sukcesi, ĉar ŝia patro konis min: mi estis samvilaĝano lia, apartenis al oldkristana familio, ĝuis la floron de miaj jaroj, posedis tre grandan havon kaj ne etan inteligenton. Sed en la sama tempo svatis sin al ŝi ankoraŭ alia junulo de la vilaĝo, kun la samaj meritoj kiel mi, kio igis ŝian patron heziti kaj lasi la aferon nedecidita, ĉar ŝajnis al li, ke ŝia filino farus konvenan

edziniĝon, tiel kun unu, tiel kun la alia. Por eltiri sin el sia embaraso, li decidis komuniki la dilemon al Leandra (tiel nomiĝas la riĉa knabino puŝinta min en ĉi mizeron), pensante, ke, ĉar ni ambaŭ estis egalaj, li devus lasi sian karan filinon elekti laŭ sia propra inklino: konduto imitinda de la patroj, kiuj deziras doni edziĝan staton al siaj filoj. Mi ne volas diri, ke oni permesu ilin elekti inter fiaj aŭ malicaj, sed ke oni prezentu al ili bonajn, kaj tiam, ke oni lasu al ili la liberon decidi. Mi ne scias kion respondis Leandra; mi scias nur, ke la patro obĵetis al ni, dirante ke lia filino tro junas ankoraŭ, kvankam li parolis tiel nekonkrete, ke li nek devontigis sin, nek rifuzis nin. Mia rivalo nomiĝas Anselmo, kaj mi Eugenio: vi jam konas do la nomojn de la personoj partoprenantaj en ĉi tragedio, kies finon, ankoraŭ nesolvitan, oni antaŭvidas katastrofa.

»Tiam aperis en nia vilaĝo iu Vicente de la Roca, filo de senhava kampulo tiea; la dirita Vicente venis de Italio kaj de aliaj diversaj lokoj, kie li soldatis. Pli frue, kiam li havis proksimume dek du jarojn, okazis, ke iu kapitano pasis kun sia kompanio tra la vilaĝo kaj prenis kun si la knabon; kaj nun, dek du jarojn poste, li revenis en soldata kostumo milkolore bunta, kovrita per mil vitraj brelokoj kaj ŝtalaj ĉenetoj. Li paradis foje en iaj garnoj, foje en aliaj, sed ili vidiĝis ĉiuokaze brilaĉaj, fragilaj, falsaj kaj ĉipaj. La kampuloj, kiuj estas ne nur malicetaj laŭnature, sed la maliceto mem kiam ili havas nenion por fari, observis kaj memoris ĉiun el liaj garnoj kaj tombakoj, kaj trovis, ke li posedas nur tri vestojn de diversaj koloroj, kun la respektivaj ŝtrumpoj kaj ĵarteloj; sed li tiel transformis kaj kombinis ilin, ke, se oni ne scius la nombron de liaj vestoj, oni ĵurus, ke li paradas per pli ol dek paroj da kostumoj kaj per pli ol dudek ĉapel-plumoj. Kaj oni ne pensu superflua aŭ teda tion pri la vestoj, ĉar ili ludas gravas rolon en ĉi historio.

»Nu, li kutime sidis sur benko, apud la granda poplo de nia placo, kaj tie li tenis nin pendantaj de liaj lipoj, kiam ni gape aŭskultis lin rakonti siajn heroaĵojn. En la tuta mondo ne ekzistis lando, kiun li ne vizitis, nek batalo, kiun li ne partoprenis; li sola mortigis pli da maŭroj, ol da ili loĝas en Maroko kaj Tunizio, kaj intervenis en pli da dueloj, laŭ siaj asertoj, ol Gante, Luna, Diego García de Paredes kaj aliaj mil, kies nomojn li menciis: kaj ĉiam li venkis, sen perdi eĉ unu guton da sango. Krome, li montris al ni nombron da cikatroj, kaj, kvankam ni ne povis ilin distingi, li klopodis persvadi nin, ke ilin rezultigis arkebutaj pafoj ricevitaĵoj en diversaj bataloj kaj eskirmoj.^[198] Plie, kun neimagebla aroganto, li traktis superece siajn egalulojn, eĉ siajn amikojn, kaj diris, ke lia patro estas lia brako, ke lia geneologio konsistas el liaj faroj, kaj ke, ĉar soldato, li ŝuldas nenion eĉ al la reĝo mem. Oni aldonu al ĉi fanfaronado, ke li sciis iom da muziko kaj ludis arpeĝe la gitaron, tiel, ke kelkaj diris, ke li igas ĝin paroli. Sed ne finiĝis per tio liaj talentoj, ĉar li ankaŭ versadis, kaj kutime, surbaze de ajna sensignifaĵo okazinta en la vilaĝo, komponis romancojn ses mejlojn longajn.

»Ĉi soldato ĉi tie priskribita, ĉi Vicente de la Roca, ĉi brava dandaĉo, ĉi muzikanto kaj poeto estis plurfoje admirata de Leandra tra fenestro de ŝia domo kun vido sur la placon. Ŝin ravis la brilaj tombakoj de liaj kostumoj; ŝin ĉarmis liaj romancoj, ĉar li faris almenaŭ dudek kopiojn de ĉiu poemo sia; al ŝia orelo venis la heroaĵoj, kiujn li mem atribuis al si; kaj fine, ĉar certe la diablo tion dekretis, ŝi enamiĝis al li, antaŭ ol li farus al si la absurdan ideon amindumi ŝin. Kaj tial, ke am-afero tre rapide sukcesas, kiam ĝin helpas la deziro de la damo, Leandra kaj Vicente facile akordiĝis, kaj antaŭ ol iu el ŝiaj multaj svatiĝantoj suspektus ilian projekton, ŝi jam plenumis ĝin, forlasante la domon de sia kara patro (patrinon ŝi ne havas) kaj fuĝante kun la soldato, kiu triumfis en ĉi entrepreno pli multe ol en siaj elpensitaj heroaĵoj.

»Ĉi evento kaŭzis konsternon en la tuta vilaĝo kaj eĉ inter la foranoj eksciintaj pri la novaĵo. Mi kaptiĝis de stuporo, Anselmo de miro, ŝia patro de aflikto, ŝiaj parencoj de honto; la justico intervenis kaj la taĉmentanoj viglis; oni blokis la vojojn, esploris la arbarojn kaj ĉion ceteran, kaj tri tagojn poste, oni trovis en kaverno de monto la kapriceman Leandra en ĉemizo nur, sen la granda kvanto da mono kaj valoregaj juveloj, kiun ŝi prenis kun si el la domo. Oni kondukis ŝin antaŭ ŝia afliktita patro, pridemandis ŝin, kaj ŝi spontane konfesis, ke Vicente de la Roca trompis ŝin; ke, ĵurante edziĝi al ŝi, li ŝin persvadis forlasi la hejmon, ke li promesis preni ŝin al la plej riĉa kaj delica urbo de la tuta mondo: al Napolo, kaj ke pro sia naivo kaj manko de sperto, ŝi kredis lin. Ŝi aldonis ke, en la sama nokto, kiam ŝi priŝtelis sian patron, ŝi konfidis sin al li, ke li kondukis ŝin al sovaĝa monto kaj ŝin enfermis en la kaverno, kie oni ĵus ŝin trovis. Ŝi diris ankaŭ, ke la soldato faris nenian perforton kontraŭ ŝia virto, kvankam li rabis de ŝi kion ŝi kunportis, antaŭ ol li forlasis ŝin en la kaverno: ŝia deklaro kaŭzis denove ĉies admiron, ĉar tia deteniĝemo de la junulo ŝajnis apenaŭ kredinda. Sed ŝi tiel insistis pri la vero de sia aserto, ke ŝia nekonsolebla patro parte konsoliĝis kaj apenaŭ bedaŭris la valoraĵojn forprenitajn, konsiderante, ke lia filino konservis ankoraŭ la juvelon, kiu, se perdita, ne plu retroveblas. En la sama tago de la apero de Leandra, lia patro denove igis ŝin malaperi el ĉies vido, enfermante ŝin en monaĥinejon de proksima vilaĝo, kun la espero, ke la tempo iel forgesigus la mavan reputacion, kiun ŝi akiris per sia konduto. La juneco de Leandra servis kiel eskuzo de ŝia faro, almenaŭ ĉe la personoj ne interesataj juĝi ŝin bona aŭ mava; sed la konantoj de ŝia prudento kaj saĝo atribuis ŝian pekon, ne al manko de scio, sed al ŝia frivolemo kaj al la natura inklinado de la virinoj, pliparte kapricaj kaj senprincipaj.

»Do oni enfermis Leandran, kaj Anselmo kvazaŭ blindiĝis, aŭ, almenaŭ, liaj okuloj vidis nenion plaĉan; la miaj, same en

la tenebro, ne distingis eĉ unu lumeton, kiu gvidis ilin al pli agrablaj perspektivoj. Ĉe la foresto de Leandra, nia aflikto kreskis kaj nia pacienco elĉerpiĝis; ni malbenis la garnojn de la soldato kaj indignis pro la manko de antaŭzorgo de ŝia patro. Fine Anselmo kaj mi interkonsentis forlasi la vilaĝon kaj veni al ĉi valo, kie li paŝtas grandan kvanton da ŝafinoj siaj, kaj mi multenombran gregon da kaprinoj miaj, kaj tiel ni pasas la vivon inter la arboj, kie ni libere proklamas nian senton, foje kunkantante laŭdon aŭ riproĉon al la bela Leandra, foje suspirante solaj kaj aparte kaj konfidante niajn plendojn al la ĉielo. Multaj el la aliaj svatiĝintoj de Leandra, sekvante nian ekzemplon, venis al ĉi sovaĝaj montoj, imitis nian konduton, kaj tiel abundas, ke ŝajnas, ke ĉi loko ŝanĝiĝis en novan Arkadion, se konsideri, ke ĝi plenas de paŝtistoj kaj gregoj, kaj ke ĉie aŭdiĝas la nomo de la bela Leandra: unu viro ŝin malbenas kaj nomas ŝin kapricema, flirt-anima kaj senpudora; alia kondamnas ŝian frivolan kaj cedeman spiriton; pluraj absolvas kaj pardonas ŝin, kaj kelkaj ŝin akuzas kaj insultas; ĉi viro laŭdas ŝian belon, alia kritikas ŝian karakteron; kaj fine, ĉiuj abomenas kaj adoras ŝin, kaj la frenezo tiel penetris en ĉies koron, ke kelkaj plendas pro ŝia disdegno, kvankam ili neniam parolis kun ŝi; dume, aliaj lamentas sian faton kaj konsumiĝas de blinda ĵaluzo, pri kio ŝi ne kulpas, ĉar, kiel dirite, oni konis pli frue ŝian pekon ol ŝian enamiĝon.

»Ne ekzistas truo de roko, nek bordo de rojo, nek ombro de arbo, kie ne sidas iu paŝtisto diranta sian misfortunon al la ventoj; la eĥo, kie ajn ĝi povas formiĝi, ripetas la nomon de Leandra. «Leandra!», resonas la montoj; «Leandra!», murmuras la rojoj. Kaj Leandra tenas nin ensorĉitaj kaj konfuzaj, kaj ni esperas sen espero, kaj timas sen scii kion timi. Inter ĉi ekstravagancaj uloj, mia rivalo Anselmo estas la plej saĝa kaj samtempe la plej sensenca, ĉar, kvankam li povus plendi pri multaj aliaj aferoj, li plendas nur pri ŝia foresto kaj, akompanate de vjolo, kiun li mirinde ludas, li

kantas sian bedaŭron per inspiritaj versoj. Mi sekvas alian vojon pli facilan kaj eble pli ĝustan, nome, paroli kontraŭ la frivolo, nekonstanteco, hipokrito, ĵurorompoj kaj ne plenumitaj promesoj de la virinoj, kaj kontraŭ ilia fuŝa juĝokapablo, kiam ili elektas la objekton de siaj pensoj kaj deziroj. Jen, sinjoroj, la kaŭzo de miaj vortoj al la kaprino, kiam mi alvenis ĉi tien; ĉar, kvankam ŝi estas la plej bona el mia grego, mi disdegnas ŝin pro ŝia sekso. Tia estas la historio, kiun mi promesis rakonti al vi. Se ĝi ŝajnis al vi tre longa, mi klopodos tre longe servi vin: mia kabano staras proksime, kaj tie mi havas freŝan lakton kaj ege bongustan fromaĝon kune kun aliaj diversaj kaj maturaj fruktoj, tiel agrablaj al la okuloj kiel al la palato.

[198] Neologismo. Hispane «escaramuza»; angle «skirmish»; france «escarmouche». Bataleto.

Ĉapitro 52

Pri la lukto inter don Quijote kaj la kapristo, kun la rara aventuro de la flagelantoj, kiun la hidalgo pene sed sukcese plenumis

La rakonto de la kapristo tre plaĉis al la tuta kompanio, precipe al la kanoniko, kiu tre surpriziĝis de lia rakonta stilo, pli propra al rafinita kortegano, ol al kruda kapristo, kio movis lin diri, ke la pastro pravis, kiam li antaŭe asertis, ke la montoj naskas klerulojn. La tuta grupo metis sin je la dispono de Eugenio, sed la plej sinproponema ĉi-rilate estis don Quijote.

—Certe, amiko kapristo —li diris—, se mi rajtus entrepreni ajnan aventuron novan, tuj mi ekirus survoje por doni sukcesan finon al la via; mi elprenus Leandran el la monaĥinejo (kie nedubeble ŝi estas enfermita kontraŭ sia volo) spite al la abatino kaj al la ceteraj personoj pretaj oponi al mi; poste mi metus ŝin en viajn manojn, ke vi disponu ŝin laŭplaĉe, sed observante la leĝojn de la kavalirismo, kiuj prohibas fari perforton al ajna pucelo. Sed mi esperas al Dio, nia Sinjoro, ke la povo de malica sorĉisto fine cedos al la potenco de alia pli bonintenca, kaj tiam vi ricevos mian favoron kaj mian helpon, ĉar mia profesio devigas min protekti la feblajn kaj la misfortunajn.

La kapristo rigardis lin, kaj tial, ke li vidis la hidalgon tiel aĉ-aspekta, surpriziĝis, kaj demandis al la barbiro, proksima al li:

—Sinjoro, kiu estas ĉi viro tiel stranga kaj tiamaniere parolanta?

—Kiu povus esti, se ne la fama don Quijote de La Mancha, riparanto de arbitroj, ĉampiono de la ofenditoj, protektanto de la puceloj, teruro de la gigantoj kaj triumfa batalanto?

—Tio similas —diris la kapristo— al la materialo de la libroj kavaliraj, kies herooj faris kion, laŭ via moŝto, faras ĉi viro: tamen, mi supozas, aŭ ke via moŝto ŝercas, aŭ ke la kameroj de la kapo de ĉi bonulo estas tute vakaj.

—Vi, grandega fripono! —kriis don Quijote—. Vi estas vaka kaj idiota! Mia cerbo multe pli plenas, ol plenis la putino filino de putino vin naskinta!

Kaj, tion dirante, li subite prenis panon proksiman kaj ĵetis ĝin tiel furioze al la vizaĝo de la kapristo, ke ĝi enbatis al li la nazon; sed la kapristo, kiu absolute ne toleris tiajn ludojn, vidis, ke oni senkompate mistraktas lin, kaj ne donante atenton al la tapiŝo, al la tablotuko aŭ al la kunmanĝantoj, saltis sur don Quijote, stringis al li la kolon per la du manoj, kaj sendube lin strangolus, se Sancho ne intervenus en la ĝusta momento: li kaptis la kapriston je la dorso kaj faligis lin sur la tapiŝon, kio rompis telerojn, detruis tasojn kaj renversis kaj dispuŝis ĉion tie antaŭe metitan. Don Quijote, vidante sin libera, ĵetis sin sur la kapriston, kiu, kun la vizaĝo plena de sango kaj kun la korpo pistita de la kalcitroj de Sancho, serĉis kvarpiede ian tranĉilon sur la tapiŝo por fari sangan venĝon; la pastro kaj la barbiro lin retenis, sed la barbiro tiel manovris, ke la kapristo povis meti la hidalgon sub sin, kaj tiom batis lin, ke de ties vizaĝo fontis tiel multe da sango, kiel de la lia. La kanoniko kaj la pastro eksplodis per ridegoj, la taĉmentanoj saltis de ĝojo kaj oni incitis la du luktantojn, kvazaŭ temus pri du hundoj, kiuj mordas sin reciproke; nur Sancho desperis, ĉar unu el la servistoj de la kanoniko lin retenis, kaj li ne povis helpi sian mastron.

Nu, la tuta grupo ege ĝuadis la spektaklon, escepte de la du batatoj sin reciproke draŝantaj, kaj tiam aŭdiĝis trumpeta sono tiel morna, ke ĉies vizaĝoj turniĝis al la loko, de kie la sono ŝajnis veni. Sed plej ekscitita montriĝis don Quijote; ankoraŭ sub la kapristo tute malgraŭ sia volo, kaj pli ol sufiĉe pistita, li diris:

—Frato demono (ĉar sendube demono vi estas, tial, ke via kuraĝo kaj forto kapablis submeti la miajn), mi petas vin, ke ni faru paŭzon en nia batalo, ne pli ol unuhoran, ĉar la trista sono trumpeta trafanta al ni la orelon ŝajnas voki min al nova aventuro.

La kapristo, jam laca doni kaj ricevi batojn, lasis lin libera; don Quijote stariĝis, same turnis la kapon al la loko, de kie la sono venis, kaj ĝuste tiam vidiĝis, ke multaj homoj en blankaj roboj, laŭ la kutimo de la flagelantoj, descendas sur deklivo de monteto. Okazis, ke tiujare la nuboj rifuzadis sian humidon al la tero, kaj ĉie en la distrikto oni procesiis, publike kunpreĝis kaj pentofaris, por ke Dio montru sian mizerikordon sendante pluvon; kaj ĉi-cele la homoj de proksima vilaĝo aliris nun procesie al ermitejo staranta en la valetto. Don Quijote rimarkis la strangajn robojn de la flagelantoj, kaj, forgesante ke li jam antaŭe vidis ofte similajn aferojn, li imagis, ke antaŭ li prezentiĝas ia aventuro, kaj ke li sola, kiel vaganta kavaliro, devas ĝin entrepreni. Ĉi iluzio konfirmiĝis en li, kiam li vidis, ke la flagelantoj portas statuon en funebraj vualoj, kaj li pensis, ke tio estas granda damo perforte kondukata de kovardaj kaj perversaj friponoj. Nu, kiam ĉi ideo fiksiĝis en lia menso, li kuris al Rocinante proksime paŝtiĝanta, prenis la bridon kaj la ŝildon, kiuj pendis de la sel-arko, rapide metis la mordaĵon al la ĉevalo, kaj, petante sian glavon al Sancho, saltis sur Rocinante, fiksas la ŝildon al la brako kaj diris laŭte:

—Nun, kuraĝa kompanio, vi vidos, kiel gravas la ekzisto, en la mondo, de membroj de la ordeno de la vaganta kavalirismo. Nun vi komprenos, kiel estimindas la vagantaj kavaliroj, kiam vi vidos min liberigi ĉi bonan damon submetitan al kaptiteco.

Tion dirante, li premis la kruojn kontraŭ Rocinante, ĉar li ne portis spronojn, kaj en rapida troto —ĉar en ĉi vera historio, oni legas, ke en nenia okazo Rocinante galopis— li ĵetis sin kontraŭ la flagelantoj, malgraŭ ke la pastro, la kanoniko kaj la barbiro provis lin deteni; sed ili ne sukcesis, kaj ankaŭ ne Sancho, kiu laŭte kriis al li:

—Kien vi iras, sinjoro don Quijote? Kia demono sidanta en via brusto vin incitas ataki nian katolikan religion? Ve al mi!, atentu, ke tie iras procesio de flagelantoj, kaj ke la sinjorino sur la blankardo estas la tre benata figuro de la senmakula Virgino Maria. Zorgu, sinjoro, kion vi faras. Ĉi-foje vi vere perdis la kapon.

Sancho klopodis vane, ĉar lia mastro, absolute decidita impeti kontraŭ la figuroj en blanko kaj liberigi la funebre vestitan sinjorinon, aŭdis nenion, kaj, se li aŭdus, li ne irus returne, eĉ ordonate de la reĝo. Li atingis do la procesion, bridis la ĉevalon, kiu jam komencis deziri iom da ripozo, kaj diris kun raŭka kaj agitata voĉo:

—Vi, certe ne bonaj, ĉar vi kovras al vi la vizaĝon, atentu kaj aŭskultu kion mi volas diri.

La portantoj de la figuro haltis la unuaj: kaj unu el la kvar klerikoj, kiuj ĉantis la litaniojn, observante la strangan aspekton de don Quijote, la skeletecon de Rocinante kaj aliajn groteskajn detalojn ĉe nia kavaliro, respondis:

—Sinjoro frato, se vi volas ion diri, tuj ĝin diru, ĉar ĉi fratoj ĉi tie skurĝas al si la karnon ĝissange, kaj ne licas, ke ni haltu

aŭskulti ion ajn, se ĝin oni ne povas diri per du vortoj.

—Mi ĝin diros per unu —respondis don Quijote—. Jen: tuj lasu libera ĉi belan sinjorinon, kies larmoj kaj afliktita mieno klare montras, ke vi portas ŝin kontraŭ ŝia volo, kaj ke vi faris al ŝi ian aĉan malicaĵon. Mi, veninta en la mondon por ripari tiajn ofendojn, ne permesos ke vi antaŭeniru eĉ unu solan paŝon, se vi ne donas al ŝi la liberon, kiun ŝi deziras kaj meritas.

Ĉe ĉi vortoj, liaj aŭskultantoj komprenis, ke don Quijote devas esti freneza, kaj komencis tre volonte ridi; ilia rido efikis sur la koleron de don Quijote, kiel fajro sur pulvon, ĉar la hidalgo, sen diri eĉ unu plian vorton, elingis la glavon kaj sin ĵetis kontraŭ la brankardon. Unu el ĝiaj portantoj lasis la ŝarĝon al siaj kompanoj kaj iris renkonte al don Quijote, svingante unu el la forkaj stangoj uzataj por subteni la brankardon dum la ripoz-haltoj; kaj kvankam don Quijote donis tiel fortegan hakon kontraŭ la stangon, ke ĝi rompiĝis en du partojn, la atakato, per la stumpo, kiun li retenis en la mano, ellasis tielan baton sur la ŝultron de la glava brako de nia hidalgo, ke la ŝildo ne povis ŝirmi lin kontraŭ la atako de la plebano, kaj la povra don Quijote falis teren en tre mava stato. Sancho Panza, kiu, anhelante, jam preskaŭ kur-atingis lin, vidis lin fali, kaj kriis al lia agresanto ne ellasi alian baton, ĉar lia mastro estas kompatinda ensorĉito, kiu neniam malicis al ajna persono en sia tuta vivo. Sed ne la krioj de Sancho detenis la kampulon, sed la fakto, ke don Quijote kuŝis kvazaŭ morta, sen moveti manon aŭ piedon; kredante do, ke li mortigis lin, li haste suprenfaldis sian robon ĝis la zono kaj komencis kuri sur la kampoj kun la rapido de cervo.

Ĉe tio la eskortantoj de la hidalgo alvenis al la loko, kie li kuŝis; sed la procesiuloj, vidante ilin alkuri, kaj inter ili la taĉmentanojn kun ties arbalestoj, antaŭtimis ian agreson, do

haste grupiĝis ĉirkaŭ la figuro, dekapuĉis siajn vizaĝojn, kaj la flagelantoj kun la skurĝoj kaj la klerikoj kun la kandelinoj, pretis defendi sin, kaj eĉ ataki, se eble, la alkurantojn. Sed la sorto aranĝis ĉion pli bone ol oni pensus, ĉar okazis, ke Sancho ĵetis sin sur la korpon de sia mastro, kaj, kredante lin morta, elpuŝis super li la plej plororiĉan kaj ridindan lamentadon de la mondo; krome, unu kleriko de la procesio kaj la pastro rekonis unu la alian, kaj ĉi rekono kvietigis la reciprokan timon de ambaŭ partioj; per kelkaj vortoj, la pastro informis al sia konato pri don Quijote, kaj poste ili iris vidi kun la tuta bando de flagelantoj, ĉu la povra kavaliro mortis. Tiam ili aŭdis, ke Sancho Panza diras kun larmoplenaj okuloj:

—Ho, floro de la kavalirismo, unu sola bato de stango metis finon al via bone uzata vivo! Ho, honoro de via raso, honoro kaj gloro de La Mancha, kaj eĉ de la tuta mondo, kiu kaŭze de via foresto pleniĝos nun per misfarantoj, konvinkitaj ke iliaj krimoj restos senpunaj. Ho vi, plej donacema ol ĉiuj Aleksandroj, ĉar, kvankam mi servis vin nur ok monatojn, vi donis al mi la plej bonan el la insuloj ĉirkaŭataj kaj ringataj de la maro!^[199] Ho vi, humila al la orgojlaj, kaj orgojla al la humilaj,^[200] atakanto de danĝeroj, suferanto de ofendoj, enamiĝinto sen kaŭzo, imitanto de la bonaj, skurĝo de la malicaj, spitanto de la perversaj, kaj fine vaganta kavaliro, t.e. la pleja bono imagebla!

Ĉe la krioj kaj ĝemoj de Sancho, don Quijote rekonsciiĝis, kaj liaj unuaj vortoj estis:

—Tiu, kiu vivas for de vi, dolĉega Dulcinea, devas elteni eĉ pli grandajn misfortunojn ol la nunajn. Helpu min, amiko Sancho, reveni en la ĉaron ensorcitan, ĉar mi ne trovas min en tia stato, ke mi povus sidi sur Rocinante, tial, ke mi havas ĉi ŝultron dispistita.

—Tre volonte, kara sinjoro —respondis Sancho—, kaj ni revenu al nia vilaĝo kune kun ĉi sinjoroj, kies deziro estas fari bonon al vi, kaj tie ni planos alian eliron, kiu donos al ni novan famon kaj profiton.

—Tre bona ideo, Sancho —diris don Quijote—. Estus prudente atendi, ĝis pasos la misinfluo de la steloj nun reganta.

La kanoniko, la pastro kaj la barbiro diris al li, ke ili multe aprobas lian decidon, kaj, amuziĝinte per la naivaĵoj de Sancho, metis la hidalgon en la ĉaron, en la sama situacio kiel antaŭe. La procesio reordiĝis kaj sekvis sian vojon. La kapristo diris adiaŭ al la kompanio. La taĉmentanoj ne volis iri plu antaŭen, kaj la pastro pagis al ili la monon promesitan. La kanoniko petis la pastron informi lin en la futuro pri don Quijote, ĉu li resaniĝos de sia frenezo aŭ daŭros en la sama stato; tion dirinte, ankaŭ li adiaŭis por daŭrigi sian vojaĝon. Fine ĉiuj disiris en diversaj direktoj, kaj restis nur la pastro kaj la barbiro, don Quijote kaj Sancho, kaj la brava Rocinante, kiu kondukis tra ĉi aventuroj same pacience kiel ĝia mastro. La ĉaristo aljungis la bovojn, instalas la hidalgon sur faskon da fojno, kun sia kutima flegmo plu iris sur la vojo indikata de la pastro, kaj, ses tagojn poste, ili alvenis al la vilaĝo de don Quijote. La eniro okazis je la tagmezo, ĝuste en dimanĉo, kiam ĉiuj vilaĝanoj troviĝis en la placo, tra kies mezo pasis la ĉaro de la hidalgo. La homoj proksimiĝis vidi kion la ĉaro transportas, kaj miris, kiam ili rekonis sian samvilaĝanon. Unu knabo kuris sciigi al liaj mastrumantino kaj nevino, ke ilia onklo kaj mastro revenis skeleteca, flava kaj kuŝanta en ĉaro tirata de bovoj. La du bonaj virinoj koropreme kriis, vangofrapis sin mem, ĵetis malbenojn kontraŭ liaj damnindaj libroj kavaliraj, kaj ĉion ĉi ili rekomencis, kiam ili vidis la hidalgon trapasi la pordon.

Ĉe la novaĵo de la alveno de don Quijote, alkuris la edzino de Sancho Panza, ĉar ŝi jam sciis, ke li foriris kun la hidalgo por servi lin kiel ŝildisto, kaj tuj kiam ŝi vidis lin, ŝi demandis unue, ĉu la azeno fartas bone. Sancho respondis, ke pli bone ol ĝia mastro.

—Dio estu laŭdata pro sia boneco —ŝi diris—. Sed rakontu, amiko, kion vi gajnis per viaj ŝildistaj faroj? Kian jupon vi alportas al mi? Kiajn ŝuojn al viaj infanoj?

—Mi alportas nenion tian, edzino, sed ion de pli granda gravo kaj valoro —respondis Sancho.

—Tre plaĉas al mi via novaĵo —diris la virino—. Montru al mi tion de pli granda gravo kaj valoro, amiko mia. Mi volas ĝin vidi, ke mia koro ĝoju, post ol mi tiel ege tristis dum la centoj da jaroj de via foresto.

—Hejme mi ĝin montros, edzino —respondis Sancho—. Nune, estu kontenta, ĉar se Dio volos, ke ni denove vojaĝu serĉe al aventuroj, baldaŭ vi vidos min grafo aŭ gubernatoro de insulo, ne de ia vulgara insulo, sed de unu el la plej bonaj troveblaj.

—La ĉielo tion disponu, edzo, ĉar ni tre bezonas ion tian. Sed diru, kion signifas la afero pri la insuloj? Mi ne bone komprenas.

—Ne ekzistas la mielo por buŝo de azeno —respondis Sancho—. Vi komprenos siatempe, edzino, kaj eĉ surpriziĝos, kiam vi aŭdos, ke viaj servutuloj nomas vin «via sinjorina moŝto».

—Kion vi diras, Sancho, pri moŝtoj, insuloj kaj servutuloj? —demandis Juana Panza (ŝi havis tian nomon, ne kaŭze de parenceco, sed tial, ke en La Mancha, la virinoj alprenas, laŭ la moro, la familian nomon de siaj edzoj).

—Ne faru al vi tro da zorgoj por scii ĉion rapide. Sufiĉu al vi, ke mi diras la veron, do fermu la buŝon. Mi diru nur supraĵe, ke nenio en la mondo pli agrablas al honesta homo ol servi kiel ŝildisto al vaganta kavaliro en ties aventuroj. Verdire, la pliparto el ili ne havas finon tiel bonan, kiel oni dezirus, ĉar el cent, naŭdek naŭ kutime donas rezulton aĉan kaj malican. Mi scias tion proprasperte, ĉar el kelkaj aventuroj mi eltiris min bernita, kaj el aliaj kun la korpo disbatita; malgraŭe, agrablas atendi la aventurojn transirante montojn, esplorante arbarojn, grimpane rokojn, vizitante kastelojn, loĝante laŭplaĉe ĉe gastejoj, kaj pagante nenie eĉ unu groŝon.

Ĉi konversacio okazis inter Sancho Panza kaj lia edzino Juana Panza, dum la mastrumantino kaj la nevino de don Quijote, akceptis, nudigis kaj kuŝigis lin en lian liton, de kie li rigardis ilin suspekteme kaj sen bone kompreni en kia loko li troviĝas.

La pastro rekomendis al la nevino serioze prizorgi sian onklon kaj bone gardi lin, ke li ne fuĝu denove, kaj ĉi-rilate li rakontis pri tio, kiom da klopodoj necesis por konduki lin returne al la hejmo. La virinoj denove kriis, malbenis la kavalirajn librojn kaj petis la ĉielon ĵeti en la inferan abismon la aŭtorojn de tiom da mensogoj kaj absurdoj. Fine ili pensis kun angoro kaj timo, ke tuj kiam ilia mastro kaj onklo fartus iom pli bone, ili trovus sin denove solaj: kaj okazis tiel, kiel ili pensis.

Kvankam la aŭtoro de ĉi historio diligente kaj fervore klopodis trovi la rakonton de la prodaĵoj faritaj de don Quijote en ties tria eliro, li ne sukcesis trafi, almenaŭ en aŭtentaj dokumentoj, ajnan informon pri ili; la famo nur konservis, inter la tradicioj de La Mancha, ke don Quijote, forlasinte sian domon por la tria fojo, iris al Zaragoza, kie li partoprenis en kelkaj famaj turniroj kaj en aventuroj indaj je

lia kuraĝo kaj genio. Sed pri lia morto, la aŭtoro nek povus, nek sukcesus akiri ian informon, se la sorto ne metus antaŭ li oldan kuraciston, kiu posedis plumban skatolon; laŭ lia diro, oni ĝin trovis inter la ruinaj fundamentoj de antikva ermitejo tiam rekonstruata; la skatolo entenis kelke da pergamenoj, kies tekstoj, en gotikaj literoj sed en versoj kastiliaj, rakontis multe de la heroaĵoj de don Quijote kaj donis informojn pri la belo de Dulcinea de El Toboso, pri la figuro de Rocinante, pri la lojalo de Sancho Panza kaj pri la tombo de don Quijote mem kun diversaj epitafoj kaj laŭdoj rilate al lia vivo kaj kutimoj. El ĉi tombaj skribaĵoj, la legeblaj kaj deĉifreblaj aperas ĉi tie sube, dank' al la fidinda aŭtoro de ĉi nova kaj senegala historio. La dirita aŭtoro petas de siaj legantoj nenian rekompencan por la grandega laboro, kiun kostis al li esplori kaj traserĉi en ĉiuj arĥivoj de La Mancha; li deziras nur, ke oni donu al lia rakonto la saman krediton, kiun la inteligentaj personoj donas al la kavaliraj libroj nuntempe tiel furoraj; per tio la aŭtoro sentus sin kontenta kaj bone pagita, kaj stimolita serĉi kaj konigi aliajn aventurojn, se ne tiel aŭtentajn kiel ĉi rakonto, almenaŭ tiel inĝeniajn kaj distrajn.

La unuaj vortoj skribitaj sur la pergameno de la plumba skatolo tekstis jene:

La akademianoj de Argamasilla, vilaĝo de La Mancha,^[201] pri la vivo kaj morto de la kuraĝa don Quijote, *hoc scripserunt*:
^[202]

La kongolano, membro de la Akademio de

Argamasilla, al la tombo de don Quijote

Epitafo

La sencerbul' doninta al La Mancha
pli da trofeoj, ol Jazon' al Kreto;
la ventokoko manka je diskreto,
girinta al tempesto fulmo-lanĉa;

La brako de fortego ĉiotranĉa
venkinta de Katai ĝis Gaeto;^[203]
la prodo, kiun laŭdis ĝis kompleto
la Muzo verse sur la bronz' senŝanĝa;

La pinto alta super Amadisoj,
kaj la giganto apud Galaoroj
en ĉia faro ama kaj milita;

la submetinto de l' Belianisoj,
kompan' de Rocinante tra la horoj,
ĉi tie kuŝas en la tombo frida.

[199] Fakte, de kiam Sancho iĝis ŝildisto de don Quijote, pasis malpli ol monato.

[200] Sancho inversigas kion li celas diri, kaŭzante komikan efikon.

[201] La ideo de ajna akademio ekzistanta en Argamasilla, negrava vilaĝo, evidentigas la satiran intencon de Cervantes

kontraŭ la dirita loko, des pli, ke tiaj institucioj troviĝis nur en kelkaj riĉaj urboj kun multenombra loĝantaro. Pri la «akademiaj aŭtoroj» de la sonetoj kaj epitafoj, oni opinias, ke Cervantes ankaŭ ĉi tie sarkasme aludis per ili kaj per la versoj la faman Félix Lope de Vega kaj ties amikojn.

[202] Latine: «ĉi tion skribis».

[203] «Katai», nomo de Ĉinio en la Mezepoko; «Gaeto», urbo kaj haveno de Italio, ĉe la Mediteraneo.

La regalato, membro de la Akademio de Argamasilla, *in Laudem Dulcineae de El Toboso*

Soneto

Ĉi damon, jen, kun brusto pompa-mama,
vizaĝo pufa kaj bravaĉa pozo,
reĝinon Dulcinea del Toboso^[204]
adoras vere don Quijote fama.

Pro ŝi li vagis kun sopiro ama
tra granda Sierra Negra sen ripozo;
tra kampoj de Montiel daŭris la krozo
ĝis Aranjuez, en iro pland-inflama,

kvankam pri tio kulpis Rocinante.
Ĉi damo de La Mancha, ĉi venkinto,
tre junaj trafis sorton senkompatan:

ŝi ĉesis esti bela jam mortante,
kaj li, eĉ se elstare sur glor-pinto,
suferis ankaŭ amon trompan, batan.

[204] La nomo de la vilaĝo de Dulcinea estas «El Toboso», kun la hispana artikolo «el». Ŝi do estas «Dulcinea de El Toboso», sed en la hispana «de el» iĝas «del», krom se la artikolo

apartenas al propra nomo, kiel ĉi-kaze. Tamen, en multaj eldonoj de *Don Quijote* aperas «Dulcinea del Toboso», eble pro inercio. De Diego uzis ambaŭ formojn. Dum la revizio de la verko por bita eldono, la revizi-skipo decidis unuecigi per «Dulcinea de El Toboso» krom en poemoj pro la silabnombro.

La kapriculo, tre saĝa membro de la Akademio de Argamasilla, laŭde de Rocinante, ĉevalo de don Quijote de La Mancha

Soneto

De la superba trono diamanta,
kie de Marsaj plandoj sango glitas,
sian standardon la manĉano agitas
freneze, brave kaj kun man' konstanta.

Jam kuŝas armilaro stel-brilanta,
per kiu li detruas, rompas, splitas,
kaj tiaj prodo, faroj ja meritas
alian stilon de la bardo kanta.

Kaj se Gaŭlio Amadison laŭdas,
per kies bravaj idoj Grekolando
milfoje venkis, famon gajnis plene,

Belona kronas nun, ĉiuj aplaŭdas
la gloran don Quijote, kies granda
eternas en La Mancha suverene.

Forgeso ne forkaŝos lin kurtene:
eĉ Rocinante per kuraĝa ardo
superas al Briloro kaj Bajardo.^[205]

[205] Du famaj ĉevaloj en *Rolando freneza*, de la itala Ariosto.

La ŝerculo, membro de la Akademio de Argamasilla, al Sancho Panza

Soneto

Jen Sancho Panza kuŝas, korpe eta
sed granda laŭkuraĝe, sub la tero:
ŝildisto, kies simpla kaj sincera
neniam estis ie tiom neta.

Por iĝi grafo, Sancho staris preta,
sed lin detenis alta bariero,
el naŭza kaj intriga atmosfero
eĉ nune al azeno mem obĵeta.

Rajdadis ĝin (pli bone manku l' nomo)^[206]
la ŝildoporta Sancho post la lacan
hidalgon sur osteca Rocinante.

Ho, vanas la espero de la homo!
Promesas ĝi al ni kvieton pacan,
sed iĝas ombro, fumo, trapasante.

[206] Iam, oni kutime petis pardonon, kiam oni diris «porko» aŭ «azeno», eble pro influo de la Biblio, kie ambaŭ bestoj estas difinitaj «malpuraj». En aliaj okazoj oni nur nerekte aludis iliajn nomojn, kiel en ĉi verso.

La koboldo, membro de la Akademio de Argamasilla, al don Quijote

Epitafo

Kuŝas, jen, ĉi kavaliro
post misvagoj kaj batadoj;
lin surportis tra la padoj
Rocinante dum la iro.
Sancho Panza, la stultulo
kuŝas apud li, kviete,
fidelinta servoprete:
de ŝildistoj, la spegulo.

Tiktako, membro de la Akademio de Argamasilla, ĉe la tombo de Dulcinea de El Toboso

Epitafo

Jen ripozas Dulcinea;
kvankam ŝi gras-karne dikis,
ŝin la morto hida pikis,
ŝanĝis al pulvoro vea.
Ŝi en la vilaĝo famis;
de pur-rasa origino,
ŝi ja ŝajnis moŝtulino,
don Quijote ŝin tre amis.

Nur ĉi versojn oni povis deĉifri; la aliaj, kun literoj ronĝitaj de la tineoj, estis transdonitaj al akademiano, ke li ilin dedukte rekonstruu. Oni scias, ke li sukcesis je la kosto de multaj noktoj de studado kaj laboro, kaj ke li intencas ilin publikigi, kio igas nin espere atendi la trian eliron de don Quijote.

Forse altri cantera con miglior plettro^[207]

[207] Verso el la itala *Rolando freneza*: «Eble alia kantos kun pli bona plektro».

La ingênia kavaliro don Quijote de La Mancha

Dediĉo al la grafo de Lemos^[208]

Antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi sendis al via ekscelenca moŝto miajn dramojn, presitajn sed ankoraŭ ne surscenigitajn, mi diris al vi, se mi bone memoras, ke don Quijote atendis, kun la spronoj pretaj, iri kisi la manon de via ekscelenca moŝto; hodiaŭ mi aldonas, ke li jam surseliĝis kaj entreprenis la vojaĝon, kaj mi pensas, ke, se li atingos vin, per tio mi faros al vi ioman servon, ĉar oni min urĝis de ĉiu flanko, ke mi sendu lin al vi, por ke li forviŝu la ĉagrenon kaj la naŭzon kaŭzitajn de alia don Quijote, kiu, sub la masko de «dua parto»,^[209] migris tra la tuta mondo. Plej deziris lian reaperon la granda imperiestro de Ĉinio: antaŭ unu monato li sendis al mi per kuriero ĉinlingvan leteron petantan, pli ĝuste, suplikantan, ke mi sendu al li la kavaliron, ĉar li havis la intencon fondi kolegion por la instruado de la kastilia kaj uzi kiel tekston la historion de don Quijote. Krome, li informis min, ke mi estus nomita direktoro de la kolegio. Mi demandis la kurieron, ĉu lia imperiestra moŝto konfidis al li ioman sumon transdonendan al mi por la vojaĝokostoj; li respondis, ke li ricevis tute neniom. «Tiam, frato», mi replikis, «iru revene al via Ĉinio po dudek, po tridek aŭ po la nombro al vi difinita,^[210] ĉar mia sano tro ŝanceliĝas por entrepreni tiel longan vojaĝon; krom tio, ke mi ne bone fartas, mi ne havas monon, kaj imperiestro por imperiestro, aŭ monarĥo por monarĥo, mi preferas la grandan grafon de Lemos, en Napolo, ĉar, ignorante ridindajn direktorecojn, kaj kolegiajn titolojn, li subtenas kaj protektas min, kaj ŝutas sur min pli da favoroj, ol mi povus deziri». Ĉi-punkte mi adiaŭis lin; kaj ĉi-punkte mi adiaŭas vin, anticipe proponante al via ekscelenca moŝto *La laboroj de Persiles kaj Sigismonda*,^[211]

libron, kiun mi finos en kvar monatoj, *Deo volente*:^[212] ĝi estos, aŭ la plej mava, aŭ la plej bona distro-libro verkita en nia lingvo. Sed mi jam bedaŭras, ke mi diris «la plej mava», ĉar, laŭ la opinio de miaj amikoj, ĝi atingos la plejan perfektecon eblan. Via ekscelenca moŝto ĝuu kiom da sano mi povas deziri al vi. *Persiles* baldaŭ kisos al vi la manon, kaj mi la piedojn, kiel servanto de via ekscelenca moŝto. Madrid, la lastan tagon de oktobro de 1615. Servanto de via ekscelenca moŝto,

Miguel de Cervantes Saavedra

[208] Don Pedro Fernández de Castro, vic-reĝo de la regno de Napolo, hispana mecenato de la 16-a jarcento.

[209] Aludo al la dua *Don Quijote*, verkita sub la pseŭdonimo Alonso Fernández de Avellaneda kaj eldonita en Tarragona en 1614. Ŝajne la plagiatisto estis Alonso de Castillo Solórzano, apartenanta al la rondo de amikoj de Lope de Vega.

[210] Da mejloj de vojaĝo ĉiutage.

[211] Aperis la sekvantan jaron post la morto de Cervantes, t.e. en 1617.

[212] Latine: «se Dio volos».

Antaŭparolo al la leganto

Je Dio, kiel senpacience, renoma aŭ obskura leganto, vi sendube atendis ĝis nun la aperon de ĉi prefaco, pensante, ke vi trovos ĉi tie venĝon, rebatojn kaj insultojn kontraŭ la aŭtoro de la dua *Don Quijote*, t.e. kontraŭ la homo laŭdire generita en Tordesillas kaj naskita en Tarragona. Sed, vere, mi ne donos al vi tian kontenton, ĉar, kvankam la ofendoj vekas koleron eĉ en la plej mildaj brustoj, en mia koro la regulo devas allasi escepton. Vi volus, ke mi nomu lin azeno, stulta kaj aroganta; sed mi eĉ ne pensas pri tio. Lia propra peko lin punu, li fartu bone, kaj punkto. Tamen, mi ne povis ne afliktiĝi, kiam li alnomis min disdegne olda kaj kripla, kvazaŭ estus al mi eble deteni la pason de la tempo, aŭ kvazaŭ la perdo de mia mano okazintus en ajna taverno kaj ne en la plej glora evento de ĉiuj epokoj paseaj kaj futuraj. Se miaj vundoj ne imponas al la okuloj de la rigardantoj, almenaŭ ili gajnas por mi la estimon de la personoj, kiuj scias, kie mi ricevis ilin: ĉar la soldato morta en la batalo aspektas pli bone, ol sekura en la fuĝo. Kaj ĉi-rilate mia konvinko tiel firmas, ke, se mi povus elekti nun, mi preferus ankoraŭ troviĝi en tiel grandioza batalo, ol vidi min sen vundoj, sed sen partopreni en ĝi. La vundoj sur la vizaĝo kaj la brusto de soldato estas steloj, kiuj gvidas aliajn homojn al la ĉielo de la honoro kaj stimulas ilin al nobla konkurado; kaj fine, konvenas memori, ke la inspiro venas, ne de la haroj grizaj, sed de la spirito, kaj ke ĉi lasta, ĝenerale, pliboniĝas kun la paso de la jaroj. Min afliktis ankaŭ, ke li nomis min envia, kaj ke li klarigis al mi kio estas la envio, kvazaŭ mi ne konus ĝin: fakte, el la du klasoj de envio ekzistantaj, mi konas nur la sanktan, noblan kaj bonintencan. Se tiel do — kaj efektive, tiel mi opinias—, ne apartenas al mi klaĉi kontraŭ ajna sacerdoto, des malpli se li estas membro de la

Sankta Inkvizicio.^[213] Kaj se la menciita aŭtoro diris tion kun la intenco atribui al mi ian senton de envio kontraŭ la persono, kiun, mi pensas, li aludis, mi respondas, ke li absolute trompiĝis, ĉar mi kultas la genion, admiras la verkojn kaj la profunde virtan vivon de la dirita persono.^[214] Aliflanke, la deklaron de ĉi sinjoro aŭtoro, ke miaj noveloj estas pli satiraj ol ekzemplodonaj, sed bonaj, mi dankas, ĉar efektive, se bonaj, ili certe estas bonaj en ĉiuj aspektoj. Ŝajnas al mi, ke vi pensos, ke mi montras grandan sindetenon, kaj ke mi ne elpaŝas ekster la limoj de mia modesto; vere, afliktiton oni ne devus plu aflikti, kaj sendube la aflikto de ĉi sinjoro aŭtoro tre grandas, se konsideri, ke li ne kuraĝas aperi en aperta kampo kaj sub libera ĉielo, kaj kaŝas sian nomon kaj inventis al si naskolokon, kvazaŭ li kulpus pri ia majestatenco. Se hazarde vi konos lin, diru al li de mia flanko, ke mi ne sentas min ofendita: mi tre bone konas, kiaj estas la tentoj de la diablo, kaj ke unu el la plej fortaj konsistas en tio, inspiri al ajnulo la ideon, ke li povas verki kaj eldoni libron kapablan akiri por li tiom da mono kiom da famo, kaj tiom da famo kiom da mono; pruve de tio, bonvolu rakonti al li, kun via sprito kaj gracio, la jenan historion:

En Sevilla vivis frenezulo, kiu trafiĝis de la ideo plej ekstravaganca kaj absurda, neniam antaŭe okupinta la menson de frenezulo en la mondo: li faris el kano specon de tubo pinta ĉe la ekstremo, kaj, kaptinte hundon sur la strato aŭ ie ajn, per unu sia piedo senmovigis unu postan piedon de la hundo, levis la alian per la mano, enpuŝis la finon de la kano en la konvenan truon, enblovis en la kanon ĝis la hundo rondiĝis kiel pilko, donis du manfrapetojn al la ventro de la besto, kaj delasis ĝin, dirante al la spektantoj (ĉiam multenombraj): «Ĉu viaj moŝtoj opinias nun, ke ŝveligi hundon estas bagatelo?». Ĉu via moŝto opinias, ke verki libron estas bagatelo?

Kaj se ĉi rakonto ne konformas al li, diru al li, amiko leganto, ĉi alian ankaŭ pri frenezulo kaj hundo:

En Córdoba vivis frenezulo, kiu kutime portis sur la kapo pecon da marmora slabo aŭ pezan ŝtonon, kaj, kiam li renkontis distritan hundon, li apudiĝis al ĝi, lasis fali apike la ŝarĝon, kaj la besto, furioza, pafis sin for, hojlante kaj bojante, kaj kuris sen halti almenaŭ tri stratojn. Nu, okazis foje, ke inter tielaj hundoj troviĝis unu, kies mastro, ĉapofaristo, tre amis ĝin: do la ŝtono falis, trafis ĝian kapon, la vundita hundo elpuŝis ŝiran hojlon, ĝia mastro vidis la faron, indigniĝis, ekprenis mezur-vergon, alkuris al la frenezulo, vergis lin, ĝis restis al li en la korpo nenia osto nerompita, kaj, kun ĉiu bato, la ĉapisto kriis: «Fripono mizera! Mia vertago! Ĉu vi ne vidis, fiaĉa, ke mia hundo estas vertago?», kaj ripetante multfoje la nomon vertago, faris el la frenezulo pulpon. La idioto lernis la lecionon, foriris kaj dum pli ol unu monato ne reaperis en la stratoj; sed ĉe la fino de la dirita tempo, li refalis en sian oldan manion kaj eĉ ŝarĝis sin per pli granda pezo. Li proksimiĝis al ajna hundo, rigardadis lin de la kapo ĝis la fino de la vosto kaj, ne kuraĝante faligi la ŝtonon, diris: «Jen vertago! Mi estu singarda!» Fakte, ĉiun renkontitan hundon li nomis vertago, eĉ se temis pri levrelo aŭ mopso, do li ne plu lasis fali la ŝtonon.

Eble la samo okazos al ĉi aŭtoro, t.e. li ne plu kuraĝos forskui de si la ŝarĝon de sia genio en formo de libro, ĉar mavaj libroj pli duras ol la rokoj. Diru al li ankaŭ, ke pri lia minaco senigi min de mia profito pere de lia libro, mi tute ne zorgas, kaj ke mi respondas al li per la jenaj vortoj el la fama intermezo *La Perendenga*:^[215] «vivu longe mia mastro la magistratano, kaj Kristo kun ni ĉiuj». Vivu longe la granda grafo de Lemos, kies kristana spirito kaj fama donacemo tenas min surpieda malgraŭ la batoj de mia mizera sorto; kaj longe vivu la senlima karitato de lia eminenco moŝto,

kardinalo de Toledo don Bernardo de Sandoval y Rojas, kvankam ne ekzistus presejoj en la mondo, aŭ kvankam oni eldonus kontraŭ mi pli da libroj, ol da literoj troviĝas en la satiro de Mingo Revulgo.^[216] Ĉi du princoj, sen ke ili ricevus ajnan flatadon aŭ alispecan aplaŭdon de mia flanko, prenis sur sin, nur pro sia boneco, helpi kaj favori min; kaj kaŭze de tio mi sentas min pli feliĉa kaj pli riĉa, ol se la sorto estus min puŝinta sur sian pinton laŭ la ordinara maniero. Honoron povas havi la paŭpera, sed ne la fia; la malriĉo povas vuali la noblecon, sed ne obskurigi ĝin tute. Kaj, kiam la virto elradias propran lumon, eĉ se tra la angoro kaj la ruboj de la senhaveco, ĝi fine gajnas por si la estimon de la altaj kaj noblaj spiritoj kaj sekve ilian favoron.

Nek vi diru al li ion kroman, nek mi diros al vi ion plian; nur, ke vi rimarku, ke la jena, dua parto de don Quijote estas tajlita de la sama metiisto kaj el la sama ŝtofo, kiel la unua, kaj ke en ĝi plu aperas don Quijote ĝis sia morto kaj enterigo: tiel do, neniuj kuraĝu atribui al li novajn farojn, ĉar jam sufiĉas la pasintaj, same kiel sufiĉas, ke honesta viro rakontis la historion de liaj saĝaj frenezaĵoj kaj ne deziras okupi sin denove per la sama temo: se io, la bono mem, abundas, ĝi perdas valoron; kaj se io, la mavo mem, raras, ĝi akiras iomon da estimo.

Mi forgesis diri, ke vi atendu *Persiles*, kiun mi nun finas, kaj la duan parton de *Galatea*.^[217]

[213] Lope de Vega.

[214] Morda ironio de Cervantes kontraŭ Lope de Vega, kiu, malgraŭ sia pastreco, vivis diboĉe kaj skandale.

[215] Oni neniom scias nuntempe pri ĉi intermezo.

[216] Longa popola kanzonaro de nekonata aŭtoro, terura atako satira kontraŭ la regado de don Henriko la 4-a, la Impotentia, reĝo de Kastilio (1425-1474).

[217] Ties duan parton oni ne eldonis, kaj tre probable Cervantes eĉ ne havis tempon ĝin fini.

Ĉapitro 1

Pri la konversacioj de la pastro kaj la barbiro kun don Quijote dum ties malsano

Rakontas Cide Hamete Benengeli en la dua parto de ĉi historio —tria eliro de don Quijote—, ke la pastro kaj la barbiro ne iris vidi lin dum preskaŭ unu monato, por ke la pasintaj eventoj ne reviviĝu en lia memoro; tamen ili vizitadis lian nevinon kaj lian mastrumantion, kaj rekomendis al la du, ke ili bone prizorgu lin kaj donu al li manĝon fortigan kaj konvenan por la cerbo kaj la koro, kie ŝajne originis lia tuta misfortuno. La virinoj respondis, ke ĝuste tion faras kaj faros kun la pleja zorgo kaj bonvolo, des pli, ke ili rimarkis, ke don Quijote montras tre rapidan progreson en sia mensa resaniĝo. La du amikoj tre kontentis pro la sciigo, ĉar ĝi ŝajnis pruvi, ke ili bone agis, kiam ili alportis lin, ensorĉita, en la bovoĉaro, kiel oni rakontas en la lasta ĉapitro de la unua parto de ĉi bela kaj aŭtenta historio, kvankam ili montriĝis skeptikaj pri tia pliboniĝo, kiun ili konsideris preskaŭ nebla, kaj ankaŭ interkonsentis neniel aludi antaŭ la hidalgo la vagantan kavalirismon por eviti la danĝeron reaperti la vundon ankoraŭ tiel freŝan.

Nu, ili vizitis lin kaj trovis lin sidanta en la lito, vestita per kamizolo el verda flanelo kaj kun Toleda ruĝa ĉapo; li vidiĝis tiel konsumita kaj ŝrumpinta, ke lia karno ŝajnis mumia. Li akceptis ilin tre ĝentile; la du amikoj demandis lin pri ties sano, kaj don Quijote respondis tre racie kaj per bone elektitaj vortoj. En la fluo de la konversacio ili komencis diskuti pri la tiel nomataj ŝtata racio kaj metodoj de regado, jen indikante la manieron korekti arbitron, jen kritikante mison, jen reformante kutimon, jen abolante leĝon,

tiamaniere, ke ĉiu el la tri viroj ŝajnis nova leĝodonanto, moderna Likurgo aŭ freŝa Solono. Tiel profunde ili ŝanĝis la regnon, ke oni povus pensi, ke ili prilaboris ĝin per fajro kaj martelo kaj elforĝis ion tute novan. Don Quijote parolis tiel prudente pri ĉiuj temoj traktitaj, ke la du ekzamenantoj kredis sen ia dubo, ke li plene resaniĝis kaj posedas sian tutan saĝon.

La nevino kaj la mastrumantino ĉeestis ĉi konversacion kaj senĉese dankis Dion, ĉar ili vidis, ke ilia sinjoro montras solidan racion; sed la pastro, deturninte sin de sia unua intenco trakti nenian aferon kavalirisman, decidis elprovi, ĉu la sano de don Quijote estas falsa aŭ vera; tiel do, li ŝanĝis iom post iom la temon de la konversacio kaj menciis ion pri kelkaj informoj venintaj de Madrid. Li diris, interalie, ke oni certe scias, ke la turkoj alkrozas en tre potenca floto, sed ke oni konas nek ilian intencon, nek la lokon, kie tiela tempesto eksplodus. Li aldonis, ke la tuta kristanaro troviĝas en la sama stato de alarmo, kiun preskaŭ ĉiujare provokas ĉi minacoj turkaj, kaj ke lia majesta moŝto, la reĝo, jam provizis per defendoj la marbordojn de Napolo kaj Sicilio kaj la insulon Malto.

—Lia majesta moŝto agis kiel saĝega militisto, fortikigante sufiĉe frue siajn regnojn, por ke la malamiko ne trovu lin nepreparita —respondis don Quijote—. Sed, se la reĝo petus de mi konsilon, mi dirus al li, ke li uzu rimedon, pri kies ekzisto li certe tute ne pensas ĉi-momente.

Aŭdinte tion, la pastro diris en si: «Dio vin protektu, povra don Quijote, ĉar ŝajnas al mi, ke vi falis de la alta pinto de via frenezo en la profundan abismon de via naivo».

Sed la barbiro, jam pensinta la samon kiel la pastro, demandis al don Quijote pri la naturo de la rimedo, kiun, laŭ li, oni devus adopti: ĉar eble ĝi taŭgus nur por esti aldonita

al la longa listo de stultaj projektoj ofte prezentataj antaŭ la princoj.

—La mia, sinjoro Barbotranĉa, estas, ne stulta, sed bonrezulta.

—Mi ne parolis pri la via —respondis la barbiro—. Sed la sperto montris, ke la pliparto de la projektoj prezentataj al lia majesta moŝto montriĝas absurdaj aŭ neaplikeblaj, aŭ damaĝus la reĝon aŭ la landon.

—Tamen, la mia —diris don Quijote— estas nek absurda nek neaplikebla, sed la plej facila, la plej taŭga, la plej lerta kaj la plej rapide efektivebla, kiu povus fonto el la imago de plananto.

—Via moŝto tre tardas konigi ĝin al ni, sinjoro don Quijote — diris la pastro.

—Ne plaĉus al mi —respondis la hidalgo— se nune mi komunikus ĝin ĉi tie, kaj jam morgaŭ matene ĝi trafus la orelon de la sinjoroj regnaj konsilistoj, kaj aliaj ricevus dankon kaj rekompencojn por mia laboro.

—Koncerne min —diris la barbiro— mi donas al vi mian parolon ĉi tie kaj antaŭ Dio, ke, kion vi diros, mi konfidus nek al reĝo nek al turo^[218] nek al surtera homo: ĉi ĵuron mi lernis el la *Romanco de la Pastro*, en kies prefaco la pastro avertas la reĝon kontraŭ fripono ŝtelinta de li cent dublonojn^[219] kaj lian rapidan mulon.

—Mi ne konas tian historion —respondis don Quijote— sed mi scias, ke la ĵuro bonas, ĉar la sinjoro barbiro bonas.

—Eĉ se li ne bonus —diris la pastro— mi respondas pri li kaj garantias, ke ĉi-okaze li parolos ne pli ol mutulo, aŭ mi

kondukos lin antaŭ tribunalo, ke li submetu sin al ĝia juĝo kaj sentenco.

—Kaj kiu respondas pri via moŝto, sinjoro pastro? — demandis don Quijote.

—Mia profesio respondas —rebatis la pastro— ĉar ĝi postulas la gardadon de sekretoj.

—Je Dio, do! —ekkriis don Quijote—. Kion pli bonan povus fari lia majesta moŝto ol ordoni per publika distrumpetado, ke ĉiuj vagantaj kavaliroj de Hispanujo koncentriĝu en la ĉefurbo en ia difinita tago? Eĉ se prezentiĝus nur ses, eble troviĝus inter ili unu kapabla venki sola la tutan potencon turkan. Aŭskultu, viaj moŝtoj, kaj atentu kion mi diras: ĉu estas io nova, ke unu sola vaganta kavaliro detruas armeon el ducent mil viroj, kvazaŭ ili ĉiuj havus nur unu gorĝon aŭ konsistus el marcipano? Ĉu ne ekzistas multege da historioj plenaj de tiaj mirindaĵoj? Se hodiaŭ vivus —por mia misfortuno, kvankam mi ne diros, ke por la misfortuno de iu alia— la fama don Belianís aŭ unu el la nekalkuleblaj posteuloj de Amadís de Gaŭlio, kaj li alfrontus la turkojn, mi ne volus vidi min en ilia haŭto; sed Dio zorgos pri sia popolo kaj sendos kavalirojn, kiu, se ne tiel impona kiel la aventuristoj de la pasintaj epokoj, almenaŭ egalos ilin en kuraĝo: kaj Dio min komprenas kaj punkto.

—Ho ve! —ekkriis tiam la nevino—. Certe, kiel mi mortos, mia sinjoro volas denove fariĝi vaganta kavaliro!

—Vaganta kavaliro mi estos ĝis la fino —respondis don Quijote—. Kaj la turkoj krozu laŭvole ien tien kun sia tuta potenco. Mi ripetas, ke Dio komprenas min.

—Mi petas la permeson de viaj moŝtoj —intervenis la barbiro — por rakonti al vi etan historion okazintan en Sevilla: ĝi tiel bone konformas al ĉi temo, ke mi tre deziras ĝin diri.

Don Quijote donis sian permeson, la pastro kaj la ceteraj pretis aŭskulti, kaj la barbiro komencis jene:

—En la frenezulejo de Sevilla troviĝis viro, kies parencoj enfermigis lin tie, ĉar li perdis la saĝon. Li estis licenciulo pri kanonika juro el la fakultato de Osuna, sed, laŭ la opinio de multaj personoj, li same frenezus, eĉ se li akirintus la licencion ĉe la universitato de Salamanca. Ĉi licenciulo, post kelkaj jaroj de enfermiteco, imagis, ke li jam retrovis sian tutan racion kaj, posedata de ĉi iluzio, li skribis plurfoje al la ĉefepiskopo por komuniki al li, per tre prudenta argumentado kaj elkoraj petoj, ke li ordonu liberigi lin de tiel mizera situacio, ĉar la dia mizerikordo redonis al li la saĝon; li aldonis, ke liaj parencoj, por profiti lian havon, tenas lin enfermita tie, kaj ke ili klopodus, spite al ĉia evidento, ke oni rigardu lin freneza ĝis lia morto. Fine la ĉefepiskopo impresiĝis de liaj multaj leteroj prudentaj kaj raciaj, kaj ordonis unu el siaj klerikoj informiĝi pere de la direktoro de la frenezulejo, ĉu tio, kion la licenciulo skribis al li, respondas al la vero. La kleriko do vizitis la direktoron, kiu sciigis lin, ke la viro frenezas ankoraŭ, kaj ke, kvankam li ofte parolas kiel persono de granda saĝo, ĉe la fino li refalas en tiajn ekstravagancojn, ke ili egalas, laŭ nombro kaj grandeco, al la diskretaĵoj de la komenco de lia konversacio, kion oni povus konstati parolante kun li.

»La kleriko decidis fari la provon, vizitis do la lunatikon, parolis kun li pli ol unu horon kaj, en la dirita tempo, la licenciulo diris nenion absurdan aŭ strangan; male, li esprimis sin tiel saĝe, ke la kleriko absolute konvinkiĝis, ke ia interparolanto havas la menson sana; interalie la lunatiko diris al li, ke la direktoro falsas la veron, ĉar li ricevas donacojn de liaj familianoj, ke li asertu, ke la licenciulo frenezas ankoraŭ, malgraŭ siaj lucidaj periodoj. Li aldonis, ke la pleja kulpanto de lia misfortuno estas lia granda havo, ĉar, por profiti ĝin, liaj malamikoj, helpante sin per la

mensogo, proklamas, ke en lia kazo ne ekzistas la dia favoro, kiu efektive relevis lin de besto en homon. Resume, li tiel parolis, ke liaj vortoj igis la direktoron suspektinda, liajn parencojn kruelaj kaj mon-avidaj, kaj lin mem mense sana, ĝis tia ekstremo, ke la kleriko decidis preni lin kun si, por ke la ĉefepiskopo vidu kaj konstatu la veron de la afero; kun sia tuta bona fido la brava kleriko petis la direktoron, ke li ordonu redoni al la licenciulo ties proprajn vestopecojn, sed la direktoro ripetis, ke li bone pripensu sian decidon, ĉar, sen ia dubo, la licenciulo frenezas ankoraŭ. Tamen la kleriko insistis, la direktoro fine cedis, tial, ke la peton faris reprezentanto de la ĉefepiskopo, oni vestis la licenciulon per lia propra vesto nova kaj konvena, kaj, vidante sin sen la ĉifonoj de lunatiko kaj en vesto de mense sana homo, li petis de la kleriko permeson por diri adiaŭ al siaj kamaradoj frenezuloj. La kleriko respondis, ke li ŝatus akompani lin kaj vidi la pacientojn de la domo. Tiel do, ambaŭ, akompane de kelkaj aliaj personoj ĉeestintaj la konversacion, surprisis la ŝtuparon, la licenciulo haltis ĉe kaĝo, kie sidis furioza frenezulo, kvankam tiam kvieta kaj trankvila, kaj diris al li:

»—Frato, vidu, ĉu vi havas ian komision por doni al mi, ĉar mi foriras hejmen; kvankam mi ne meritas Lian favoron, Dio volis en sia senlima mizerikordo kaj boneco redoni al mi la saĝon: mi estas jam sana kaj prudenta, ĉar nenio neebla ekzistas por la povo de Dio. Havu firman esperon kaj fidon rilate Lian helpon: se Li restarigis min en mian unuan staton, ankaŭ Li faros la saman al vi, se vi fidus Lin. Mi zorgos pri tio, sendi al vi bonan nutron; kaj ĉiam manĝu ĝin, ĉar mi devas diri al vi, ke, laŭ mia opinio kaj mia propra sperto, nia frenezo venas de tio, ke ni havas la stomakon vaka kaj la cerbon plena de aero. Tenu vin firma, amiko, tenu vin firma, ĉar desperi en la misfortunoj detruas la sanon kaj kaŭzas la morton.

»Alia lunatiko enfermita en kaĝo kontraŭa al la kaĝo de la furiozulo aŭskultis la vortojn de la licenciulo kaj levante sin de eluzita mato, kie li kuŝis tute nuda, demandis laŭte, kiu do foriras mense kaj korpe sana.

»—Mi foriras, frato —respondis la licenciulo—. Mi ne bezonas resti plu ĉi tie kaj senĉese dankas la ĉielon, ke ĝi faris al mi tiel grandan favoron.

»—Atentu kion vi diras, licenciulo —diris la alia—. Ne lasu vin trompi de la diablo... Viaj piedoj ripozu, vi plu sidu trankvile en via ĉelo, kaj tiel vi ŝparos al vi la ĝenon fari revenan vojaĝon.

»—Mi scias, ke mi sanas —respondis la licenciulo— do ne ekzistas motivo, ke mi denove venu ĉi tien loĝi.

»—Vi sana? —diris la freneza—. Nu, ni vidos. Dio vin akompanu, sed mi ĵuras je Jupitero, kies majeston mi reprezentas sur la tero, ke pro ĉi sola peko, kiun hodiaŭ faras Sevilla donante al vi la liberon kaj konsiderante vin mense sana, mi punos ĝin tiamaniere, ke oni memoros mian venĝon eterne tra la jaroj, amen. Ĉu vi ne scias, ridinda licenciulo, ke mi povas tiel venĝi, ĉar, kiel dirite, mi estas Jupitero tondra kaj tenas en la manoj la flamajn fulmojn kaj per ili mi povas, kaj kutimas, minaci kaj detruigi la mondon? Tamen per nur unu puno mi turmentos ĉi senscian urbon: ne pluvos sur ĝin nek sur ties ĉirkaŭon dum tri kompletaj jaroj, kies tempon oni komencu kalkuli de la tago kaj la momento, kiam mi faras ĉi minacon. Ĉu vi libera kaj sana, kaj mi freneza kaj en ĉenoj? Tiel distas de mi la ideo faligi pluvon, kiel la ideo pendumi min!

»La ĉeestantoj atente aŭskultis la kriojn kaj la vortojn de la freneza; sed la licenciulo sin turnis al la kleriko, ekprenis lin je la manoj kaj diris:

»—Ne zorgu via moŝto, kaj ne donu vian atenton al la diroj de ĉi lunatiko: se li estas Jupitero kaj volas ĉesigi la pluvon, mi estas Neptuno, patro kaj dio de la akvo, kaj ordonos pluvi tiel ofte kiel mi volos kaj kiam necese.

»—Tamen, sinjoro Neptuno —respondis la kleriko—, ne konvenus ĉagreni sinjoron Jupitero; via moŝto restu ĉi tie, hejme, kaj ni venos forkonduki vin, kiam ni havos pli da tempo.

»La direktoro kaj la ceteraj ĉeestantoj ekridegis, dum la kleriko iom hontis ĉe iliaj ridoj. Poste oni nudigis la licenciulon, li restis en la ĉelo, kaj jen, la rakonto finiĝas.

—Tiel do, sinjoro barbiro —diris don Quijote—, ĉu tia estis la historio tiel konforma al la temo, ke vi devis nepre ĝin rakonti? Ha, sinjoro Vango-raspa! Kiel multe blindas la persono nekapabla vidi tra stamino de kribriilo! Ĉu eble via moŝto ne scias, ke la komparoj inter talento kaj talento, kuraĝo kaj kuraĝo, belo kaj belo, kaj moŝto kaj moŝto ĉiam estas abomenindaj kaj neakcepteblaj? Mi, sinjoro barbiro, nek estas Neptuno, la dio de la akvo, nek pretendus, ke oni konsideru min saĝa, se mi ne estus tia. Mi klopodas nur komuniki al la mondo tion, kiel profunde ĝi eraras, ne revivigante por si la tre feliĉan epokon, kie floris la ordeno de la vaganta kavalirismo. Sed niaj koruptaj tempoj ne meritas ĝui tiom da bono kiel ĝuis la erao, kie la vagantaj kavaliroj prenis sur sin la ŝarĝon dediĉi sin al la defendo de la regnoj, la protekto de la puceloj, la helpo al la orfoj kaj neplenaĝaj, la rekompenco al la humilaj kaj la puno kontraŭ la orgojlaj. La pliparto de la nunaj kavaliroj preferas la susuron surkorpan de siaj kostumoj el damasko, brokato kaj aliaj riĉaj ŝtofoj, al la grinco de la maŝ-kutoj; jam la kavaliroj ne plu dormas en la aperta kampo, sub la rigoroj de la vetero, armitaj kaj kirasitaj de la kapo ĝis la piedoj. Nuntempe eĉ ne unu dormas side sur ĉevalo, apogite al la

lanco kaj kun la piedoj en la piedingo, kiel dormis iam la vagantaj kavaliroj. Nuntempe eĉ ne unu eliras el arbaro, penetras transe inter montoj, paŝas poste sur dezertaj kaj sterilaj strandoj ĉe maro ofte ŝvela kaj ŝtorma, trovas sur la plaĝo boateton mankan je remiloj, veloj, masto kaj ŝnuroj, ĵetas sin en ĝin kun aŭdaca koro kaj lasas sin peli de la senkompataj ondoj, kies forto jen puŝas lin ĝis la ĉielo, jen impulsas lin en la abismon; li, ĉiam stara kontraŭ la nevenkebla tempesto, trovas, tute surprizita, ke li distancas almenaŭ naŭ mil mejlojn for de la loko, kie li enŝipiĝis; kaj tiam li elsaltas sur teron distan kaj nekonatan, kaj lin trafas aventuroj indaj esti skribitaj, ne sur pergameno, sed sur bronzo. Bedaŭrinde, en niaj tempoj triumfas la pigro super la diligento, la kuŝemo super la laboro, la diboĉo super la virto, la aroganto super la kuraĝo, kaj la teorio super la praktiko de la armoj, kiuj lastaj vivis kaj brilis nur en la ora epoko kaj inter la vagantaj kavaliroj. Se mi ne pravas, diru: ĉu ekzistis ajna homo pli virta kaj kuraĝa ol la fama Amadís de Gaŭlio? Pli saĝa ol Palmerín de Oliva? Pli afabla kaj komplezema ol Tirante la Blanka? Pli galanta ol Lisuarte de Grekujo? Pli hakanta kaj hakata ol don Belianís? Pli sentima ol Perión de Gaŭlio? Pli spita ol Felixmarte de Hirkanio? Pli sincera ol Esplandián? Pli temerara ol don Cirongilio de Tracio? Pli brava ol Rodamonte? Pli prudenta ol reĝo Sobrino? Pli aŭdaca ol Reinaldos? Pli nevenkebla ol Rolando, kaj pli vireca kaj ĝentila ol Rugero, kies posteuloj estas la nunaj dukoj de Feraro, kiel Turpín instruas al ni en sia *Kosmografio*? ĉi viroj kaj multaj aliaj menciindaj, sinjoro pastro, estis kavaliroj vagantaj, lumo kaj gloro de la kavalirismo. Mi volus, ke ili, aŭ aliaj similaj, partoprenus en mia projekto, kaj tiam lia majesta moŝto vidus sin bone servata, ŝparus multe da elspezoj, kaj la turkoj disŝirus al si la barbon pro despero. Cetere, mi deziras resti hejme, ĉar la kleriko ne lasas min libera, kaj, se, kiel diris la barbiro, Jupitero detenas la pluvon, mi estas ĉi tie, kaj pluvos, kiam

mi volos. Mi diras tion, por ke sinjoro Barbo-Pelvo sciu, ke mi tre bone komprenas lin.

—Vere, sinjoro don Quijote —respondis la barbiro—, mi ne volis aludi vin per mia rakonto, kaj ĵuras je Dio, ke mia intenco estis bona; do via moŝto ne devus senti vin ofendita.

—Se mi sentas min ofendita, aŭ ne, tio estas mia afero —rebatis don Quijote.

—Ĝis nun mi apenaŭ parolis ion —intervenis la pastro— sed ne volus plu reteni skrupulon en mi vekitan de la lastaj rimarkoj ĉi tie diritaj de don Quijote, kaj kiu ronĝas kaj raspas mian konsciencon.

—La sinjoro pastro rajtas diri ion —respondis don Quijote— do li povas deklari sian skrupulon: ĉar ne tre agrablas senti la pezon de skrupulo sur la konsciencon.

—Kun via permeso do —diris la pastro— mi konfesas, ke mi tute ne povas konvinki min, ke la tuta bando de vagantaj kavaliroj menciitaj de vi, sinjoro don Quijote, havis veran kaj realan vivon, kiel personoj el karno kaj ostoj; male, mi imagas, ke ĉio estas fikcio, fabelo kaj mensogo, sonĝoj rakontitaj de homoj en plena vekiteco, aŭ, pli ĝuste, de homoj duondormantaj.

—Jen alia eraro, kien falis ankaŭ multaj nekredantoj pri la ekzisto de tiaj kavaliroj en la mondo; jam multfoje kaj kun diversaj personoj mi klopodis elmeti sub la lumon de la vero ilian komunan eraron. Kelkfoje mi ne sukcesis en mia intenco; en aliaj okazoj mi ja sukcesis, bazante min sur argumentoj tiel certaj kaj evidentaj, ke ŝajnis al mi, ke per miaj propraj okuloj mi vidis la kavaliron Amadís de Gaŭlio altakreska, kun blanka vizaĝo, barbo ĉirkaŭtondita kaj nigra, rigardo duone afabla duone severa, parolo lakona, kaj kolero ne facile eksplodema kaj apenaŭ daŭra. Kaj same kiel mi

skizis Amadison, ŝajnas al mi, ke mi povus pentri kaj priskribi la figuron de ĉiu vaganta kavaliro trovebla en la historioj de la tuta mondo, ĉar surbaze de mia fido, ke ili estis tiaj, kiel la historioj rakontas, kaj surbaze ankaŭ de mia scio pri iliaj faroj kaj karakteroj, mi kapablus, sekvante la bonan logikon, dedukti ilian mienon, koloron de la haŭto kaj staturon.

—Laŭ vi, sinjoro don Quijote, kian staturon havis la giganto Morgante? —demandis la barbiro.

—Rilate al la ekzisto de gigantoj —respondis don Quijote— troviĝas diversaj opinioj. Tamen la Sankta Skribo, kiu ne povas devii eĉ unu colon de la vero, pruvas ilian ekziston rakontante la historion pri la enorma filiŝto Goljato, alta je sep ulnoj kaj duono,^[220] kio egalas mirigan kreskon. Krome, en la insulo Sicilio aperis tibioj kaj skapoloj, kies granda montras, ke ili apartenis al skeletoj de homoj tiel altaj kiel turoj: tion pruvas la geometrio. Tamen, mi ne povus diri kun certeco la staturon de Morgante, kvankam mi imagas lin ne tre alta, tial, ke en la historio, kie oni speciale mencias liajn farojn, oni rakontas, ke li ofte dormis sub tegmentoj, do se li povis sidi en domoj, lia granda certe ne estis ega.

—Vi pravas —diris la pastro; kaj, ĉar li ŝatis aŭskulti la hidalgon paroli pri tiaj sensencaĵoj, li demandis, kia li imagas la aspekton de la iamaj vagantaj kavaliroj Reinaldo de Montalbán, Rolando kaj la aliaj dek du paruloj de Francio.

—Pri Reinaldo —respondis don Quijote— mi kuraĝus diri, ke li havis la vizaĝon larĝa, la haŭton ruĝeta, la okulojn iom elstaraj kaj moviĝemaj, kaj ke, krome, li montris tre grandan puntilion kaj koleremon kaj amikis al latronoj kaj vagabondoj. Rilate al Rolando, Rotolando aŭ Orlando (la historioj donas al li ĉi tri nomojn) mi kredas kaj asertas, ke li havis mezan staturon, larĝajn ŝultrojn, krurojn iom kurbajn,

brunan haŭton, ruĝan barbon, vilan korpon, minacan rigardon, lakonan parolon, grandan ĝentilon kaj bonan edukitecon.

—Se Rolando ne aspektis pli alloge ol la priskribo farita de via moŝto —komentis la pastro— ne estas strange do, ke sinjorino Angélica la Bela disdegnis lin kaj lin forlasis por la linda mieno, la viglo kaj la ĉarmo de la maŭra efebo, al kiu ŝi sin donis. Kaj, certe, ŝi pravis, preferante la molon de Medoro al la aspro de Rolando.

—Ĉi Angélica, sinjoro pastro —respondis don Quijote— estis dameto sencerba, flirtema kaj iom kaprica, kiu bruadis en la mondo tiel multe pro sia manko de diskreto, kiel pro sia belo. Ŝi disdegnis milon da kavaliroj bravaj kaj saĝaj, kaj kontentiĝis per ia garzoneska paĝio belvizaĝa sen havo kaj sen famo, kun nur la reputacio, kiun li gajnis al si pro sia lojalo al sia amiko.^[221] Post ŝia hontiga sinforĝeso, la granda kantinto de la belo, la renoma Ariosto, ne kuraĝis, aŭ eble ne volis, rakonti la ceteron de la vivo, sendube ne tre virtan, kaj ĉesis okupiĝi pri ŝi, skribante:

Kaj tial, ke ricevis ŝi Katai-sceptron
alia uzos eble pli genie l' plektron.

»Sendube li diris profetaĵon (ne strange, se konsideri, ke la poetoj ricevas ankaŭ la nomon *vates*, t.e. divenantoj) ĉar, de tiam, fama poeto de Andaluzio^[222] prikantis plure ŝiajn larmojn, kaj alia renoma kaj unika poeto kastilia^[223] laŭdis verse ŝian belon.

—Diru, sinjoro don Quijote —intervenis la barbiro—. Ĉu ne ekzistis ia poeto verkinta satiron kontraŭ ĉi sinjorino Angélica, inter tiom da laŭdaj aŭtoroj?

—Mi opinias —respondis don Quijote—, ke, se Scripante aŭ Rolando estus poetoj ili farintus al ŝi bonan lavon; ĉar, laŭ kutimo propra al la naturo de la poetoj, se iliaj amatinoj (veraj aŭ imagaj, sed ĉiuokaze mastrinoj de ilia penso) disdegnas aŭ repuŝas ilin, ili venĝas sin per satiroj kaj pamfletoj, kvankam, cetere, fari tian venĝon ne apartenas al koroj noblaj. Sed, verdire, ĝisdate mi konas nenian verson fifamigan kontraŭ sinjorino Angélica, kiu tiel multe perturbis siatempe la mondon.

—Kiel nekredeble! —diris la pastro.

Sed tiam la nevino kaj la mastrumantino, jam antaŭe elirintaj el la ĉambro, komencis forte kriegi en la korto, kaj ĉiuj alkuris al la bruo.

[218] Proverba esprimo de ŝaka origino: al neniu.

[219] Neologismo. Hispane «doblón»; france «doublon»; angle «doubloon». Antikva ora monero, de diversa valoro laŭ la epokoj.

[220] Proksimume ses metroj.

[221] Laŭ Ariosto en *Rolando freneza* la amiko de Medoro estis la reĝo Dardinel de Almonte, kies kadavron Medoro retiris el kampo de batalo, ricevante seriozajn vundojn en la entrepreno.

[222] Luis Barahona de Soto, aŭtoro de la longa poemo *La larmoj de Angélica*, eldonita en Granada en 1586.

[223] Lope de Vega, aŭtoro de *La beleco de Angélica*, versa volumo aperinta en Barcelona en la jaro 1604.

Ĉapitro 2

Pri la granda disputo inter Sancho Panza kaj la nevino kaj la mastrumantino de don Quijote, kaj pri aliaj amuzaj incidentoj

Rakontas la historio, ke la voĉoj trafintaj la orelon de don Quijote, de la pastro kaj de la barbiro, venis de la nevino kaj de la mastrumantino, kiuj kriis al Sancho Panza, ĉar li volis enpuŝi sin en la hejmon por vidi la hidalgon, kaj la virinoj baris al li la eniron.

—Kion vi volas en ĉi domo, idioto? Revenu al la via, frato, ĉar vi, kaj nur vi, logas, fortiras kaj miskondukas nian sinjoron sur la vojojn de la mondo.

—Mastrumantino de Satano! —respondis Sancho—. Mi estas la logato, la fortirato kaj la miskondukato, ne via mastro; li prenis min sur la vojojn de la mondo, do vi trompiĝas de ekstremo al ekstremo. Li elŝiris min el mia domo per flatoj, promesante al mi insulon, kiun mi atendas ankoraŭ.

—Putraj insuloj vin sufoku, infera Sancho! —kriis la nevino—. Ĉiogluta, ventro sen fundo, diru, kio estas insulo? Ĉu ia manĝaĵo?

—Ne ia manĝaĵo —respondis Sancho— sed io, pli valora ol kvar urboj, kion mi regos kaj direktos pli bone ol kvar magistratoj kune...

—Tamen —diris la mastrumantino— vi ne eniros ĉi tien, vi, sako da malicoj, kofro da friponaĵoj! Iru regi vian domon kaj plugi vian parcelon, kaj ne plu pensu pri insuloj aŭ insuletoj!

Ĉi konversacio tre amuzis la pastron kaj la barbiron; sed don Quijote, timante, ke Sancho povus elŝuti rozarion da stultaĵoj kaj mencii kelke da punktoj ne tre konvenaj al lia prestiĝo, vokis lin kaj ordonis al la du virinoj silenti kaj lasi lin eniri. Sancho enpaŝis, kaj la pastro kaj la barbiro adiaŭis don Quijote, pri kies resaniĝo ili desperis, vidante kiel obstine li alkroĉiĝis al siaj absurdaj ideoj kaj teniĝis al la stulto de siaj misvagantaj kavaliraĵoj; la pastro diris do al la barbiro:

—Vi vidos, amiko, ke, en la plej neatendita momento, nia hidalgo denove flugos for.

—Mi ne dubas tion —respondis la barbiro—. Sed pri la frenezo de la kavaliro ne miras tiel multe, kiel pri la naivo de la ŝildisto: tiamaniere li konvinkiĝis, ke li ricevos insulon, ke mi kredas, ke la plej grandaj disreviĝoj imageblaj ne kapablos elpuŝi tian ideon el lia kapo.

—Dio ilin du gardu —diris la pastro— kaj ni tenu nin atentaj. Ni vidos kio rezultos el la absurda fantazio kaj de la kavaliro kaj de la ŝildisto, ĉar ŝajnas, ke oni fandis ilin en la sama muldilo, kaj ke la frenezaĵoj de la mastro valorus eĉ ne unu joton sen la stulto de la servisto.

—Vi pravas —respondis la barbiro— kaj al mi tre plaĉus scii kion ili du parolas ĉi-momente.

—Lia nevino aŭ la mastrumantino certe rakontos al ni ilian konversacion: ilia scivolo tre grandas por ne subaŭskulti.

Dume don Quijote enfermis sin kun Sancho en sia ĉambro, kaj, jam solaj, diris al la ŝildisto:

—Sancho, tre ĉagrenas min, ke vi diris, ke mi elŝiris vin el via hejmo. Vi tre bone scias, ke mi ne restis ĉe mi: ni eliris kune, vivis kune kaj vagadis kune, sub unu sama sorto kaj unu

sama destino. Se oni vin bernis unu fojon, oni min tradraŝis cent, kaj nur en tio mi havas avantaĝon super vi.

—Tiel devas esti —respondis Sancho— ĉar, laŭ la diroj de via moŝto, suferi misaventurojn apartenas pli al la vagantaj kavaliroj ol al ties ŝildistoj.

—Vi eraras, Sancho. Memoru, ke, kiel la proverbo diras, *quando caput dolet...*^[224] kaj tiel plu.

—Mi komprenas nur mian lingvon —diris Sancho.

—Mi volas diri, ke, kiam la kapo doloras, ankaŭ la membroj doloras. Mi, kiel via mastro kaj sinjoro, estas via kapo, kaj vi, kiel mia servisto, estas unu parto el mi; tial, se min trafas doloro, ankaŭ vi devas suferi ĝin, kaj same mi devas suferi vian.

—Tiel devus okazi —respondis Sancho— sed, kiam oni bernis min kiel membron, mia kapo troviĝis ĉe la alia flanko de la muro, rigardante min flugi tra la aero kaj sentante nenian doloron; nu, se la membroj havas la devon suferi la doloron de la kapo, ankaŭ la kapo devus suferi la doloron de la membroj.

—Ĉu vi volas diri, Sancho, ke mi tute ne suferis, kiam oni vin bernadis? Nek diru, nek pensu ion tian. Mi sentis pli da doloro en mia spirito, ol vi en via korpo. Sed nune ni lasu ĉi aferon: iam ni havos okazon denove trakti ĝin kaj alveni al la ĝustaj konkludoj. Amiko Sancho, diru, kion oni rakontas pri mi en la vilaĝo? Kian opinion havas pri mi la popolo, kian la hidalgoj kaj kian la kavaliroj? Kion oni komentis pri mia kuraĝo, miaj faroj kaj mia ĝentilo? Kion oni parolas pri mia decido revivigi kaj restaŭri en la mondo la forgesitan ordenon de la kavalirismo? Unuvorte, Sancho, mi volas, ke vi diru al mi ĉion, kio ĉi-rilate trafis vian orelon. Kaj bonvolu,

nek aldoni ion al la favoraj opinioj, nek depreni eĉ minimumon de la nefavoraj, ĉar devo de subuloj lojalaj estas diri al iliaj mastroj la veron en ties ĝusta formo kaj esenco, sen ke oni ĝin pligrandigu per flatoj, aŭ ĝin deduktu pro senbazaj motivoj. Sciu, Sancho, ke, se al la orelo de la princoj flugus la nuda vero, sen garnoj de flatado, la nunaj tempoj vidiĝus tute aliaj, kaj oni opinius la pasintajn epokojn pli feraj ol la epoko nia, kiu meritis la epiteton ora. Ĉi averto taŭgu al vi, Sancho, por ke vi sincere kaj fidele donu al miaj oreloj la veran respondon al miaj demandoj.

—Tre volonte, sinjoro —diris Sancho—, sed sub la kondiĉo, ke via moŝto ne koleros: ĉar vi deziras, ke mi elverŝu la nudan veron, sen garni per ia robo aŭ kostumo kion mi aŭdis.

—Nenial mi koleros —asertis don Quijote—. Vi povas paroli libere, Sancho, sen ia ĉirkaŭfrazo.

—Nu, mi devas diri do unue, ke la popolo konsideras vin ega frenezulo kaj min same granda idioto. La hidalgoj diras de sia flanko, ke vi ne tenas vin inter la limoj de via rango, ĉar vi atribuas al vi la titolon «don» kaj nomas vin kavaliro, kvankam vi posedas nur etan vitokampon, du akreojn da plugotero kaj apenaŭ paron da ĉifonoj por kovri vian nudecon. La kavaliroj komentas, ke ne plaĉas al ili, ke la hidalgoj volas konkuri kun ili, speciale la eskviroj, kiuj inkas al si la ŝuojn,^[225] kaj flikas siajn nigrajn ŝtrumpojn per verda fadeno.

—Tio ne koncernas min —respondis don Quijote—, ĉar miaj vestoj estas ĉiam bonaj kaj sen flikaĵoj: eble kun ŝiroj, sed kaŭze, ne de troa uzado, sed de la armiloj.

—Rilate al via kuraĝo, ĝentilo, faroj kaj persono ekzistas diversaj opinioj —daŭrigis Sancho—. Kelkaj diras: freneza, sed amuza; aliaj, kuraĝa, sed senfortuna; aliaj, ĝentila sed

impertinenta; resume, oni tiel kaj tiom babilaĉas pri ni, ke oni turnas vian moŝton kaj min en fetoran kaĉon.

—Memoru, Sancho —diris don Quijote—, ke, kie ajn troviĝas virto, tie oni ĝin persekutas. Nemultaj famuloj en pasintaj epokoj, eble eĉ ne unu, povis eviti la kalumnian atakon de la malico. Al Julio Cezaro, plej kuraĝa kaj saĝa kapitano, oni faris la riproĉon, ke li tro ambiciis, kaj ke nek liaj vestoj nek lia vivmaniero montriĝis tre puraj. Aleksandro, kies heroaĵoj gajnis por li la alnomon Granda, havis la famon, ke li inklinis drinkadi. Pri Herkulo, la heroo de la multaj laboroj, oni rakontas, ke li estis garzoneska kaj seks-arda; pri don Galaor, frato de Amadís de Gaŭlio, ke li ekscese lascivis; pri lia frato, ke li tro ploris. Tiel do, Sancho, inter tiom da kalumnioj ĵetitaj kontraŭ la herooj, bone povas pasi tio, kion oni diras pri mi... se oni ne diras ion kroman.

—Jen la tubero en la afero, per la diablo! —kriis Sancho.

—Ĉu oni do komentis ion plian? —demandis don Quijote.

—Restas ankoraŭ senfeligi la voston —respondis Sancho—. Kion mi diris ĝis nun, tio estis nur kisoj kaj karesoj; sed, se via moŝto deziras koni la tutan liston da kalumnioj kontraŭ vi, mi povas tuj preni ĉi tien personon, kiu rakontus ĉion al vi, sen ŝpari eĉ unu joton. Ĉar okazis, ke hieraŭ nokte, la filo de Bartolomé Carrasco alvenis de Salamanca, kie li fariĝis bakalaŭro. Mi bonvenigis lin, kaj tiam li diris, ke la historio de via moŝto cirkulas en formo de libro titolita *La ingenia hidalgo don Quijote de La Mancha*. Li aldonis, ke mi aperas tie kun mia propra nomo, Sancho Panza, kaj same sinjorino Dulcinea de El Toboso kun la sia; krome oni priskribas aferojn okazintajn nur al vi kaj mi solaj, kaj mi devis fari al mi la signon de la kruco, ĉar mi tute miris je tio, kiel la historiisto povis ilin koni.

—Certe, Sancho, la aŭtoro de mia historio estas ia saĝa sorĉisto, ĉar nenio povas kaŝiĝi de tiaj personoj— diris don Quijote.

—Sed, kiel li povus esti saĝa sorĉisto se, laŭ la bakalaŭro Sansón Carrasco (tiel nomiĝas la filo de Bartolomé), la aŭtoro de la historio havas la nomon Cide Hamete Melongeno?[[226](#)]

—Tio estas nomo maŭra —rimarkis don Quijote.

—Tre eble, ĉar mi jam aŭdis, ke la pliparto de la maŭroj amas la melongenojn.

—Certe vi eraras pri la familia nomo de ĉi Cide, kiu en la araba signifas «sinjoro».

—Povas esti —respondis Sancho— sed, se via moŝto deziras, ke mi prenu la bakalaŭron ĉi tien, mi tion faros en la daŭro de palpebrumo.

—Vi donus al mi grandan plezuron, amiko —diris don Quijote—. Mi tute surpriziĝis, aŭdante kion vi diris; kaj ĉiu plenbuŝo, kiun mi manĝos, faros al mi nenian bonon, ĝis oni plene informos min pri la afero.

—Do mi iras voki lin —respondis Sancho.

Li forlasis sian sinjoron, serĉis ia bakalaŭron, revenis kun li iom poste, kaj la tri interparolis en amuzega konversacio.

[[224](#)] Latinaĵo, kies kompleta teksto jenas: *Quando caput dolet, caetera membra dolent*: «Kiam la kapo doloras, ankaŭ ĉiuj membroj doloras».

[[225](#)] Por kaŝi la fendojn kaŭzitajn de troa uzado.

[[226](#)] Sancho diris erare «Melongeno» anstataŭ «Benengeli», kiu nomo en la araba signifas «melongena».

Ĉapitro 3

Pri la komika konversacio inter don Quijote, Sancho Panza kaj la bakalaŭro Sansón Carrasco

Tre enpena atendis don Quijote la alvenon de la bakalaŭro Sansón Carrasco, de kiu li esperis aŭdi pri siaj propraj aventuroj, aperintaj en formo de libro, kiel Sancho diris; li ne povis kredi la ekziston de tia libro, nek ke oni jam dezirus publikigi liajn glorajn farojn, se konsideri, ke preskaŭ ne sekiĝis ankoraŭ, sur la klingo de lia glavo, la sango de la malamikoj, kiujn li mortigis. Tamen li imagis, ke ia sorĉisto, amiko aŭ antagonisto, presigis la rakonton de liaj heroaĵoj, dank' al sia magia arto: se amiko, por pligrandigi kaj levi lin super la plej gloraj kavaliroj vagantaj; se antagonisto, por fifamigi lin kaj lin faligi pli suben ol la plej malnoblaj ŝildistoj, pri kies faroj oni estus verkinta iam, kvankam (li diris en si), oni neniam skribis aventurojn de ŝildistoj. Kaj se, efektive, ekzistis lia historio, ĝi nepre devus montriĝi elokventa, impona, fama, superba kaj aŭtenta, ĉar kavalira. Ĉi penso iom konsolis lin; sed la fakto, ke la aŭtoro estis maŭro, kiel indikis la nomo Cide, afliktis lin, tial, ke ĉiuj maŭroj havas mensogan, falsan kaj disputeman naturon. Li timis ankaŭ, ke la historiisto eble traktis nedece lian amferon, makulante kaj damaĝante la honoron de lia sinjorino Dulcinea de El Toboso, anstataŭ proklami (kiel la hidalgo dezirus), ke li ĉiam tenis sin fidela kaj respekta al ŝi, disdegnante reĝinojn, imperiestrinojn kaj pucelojn de ĉia rango, kaj bridante la naturan impulson de sia karno. Kaj tiel, envolvita kaj reenvolvita en mil fantaziojn, trovis lin Sancho kaj Carrasco, kiun lastan salutis la hidalgo kun granda ĝentilo.

La bakalaŭro, kvankam nomita Sansón,^[227] estis ne de alta staturo, sed tre ŝercema, kun pala haŭto kaj forta inteligento. Li havis proksimume dudek kvar jarojn, rondan vizaĝon, platan nazon kaj grandan buŝon, t.e. ĉiun signon propran al petola karaktero amanta ŝerci kaj blagi, kion li bone montris, kiam li genuiĝis antaŭ don Quijote kaj diris:

—Sinjoro don Quijote de La Mancha, permesu min kisi la manon de Via Alteco. Je la kostumo de Sankta Petro, kiun mi portas,^[228] kvankam mi ricevis nur la kvar unuajn ordinojn, mi ĵuras, ke via moŝto estas unu el la plej famaj vagantaj kavaliroj ekzistintaj, kaj eĉ ekzistontaj, sur la tuta surfaco de la mondo. Longe vivu Cide Hamete Benengeli, la aŭtoro de la historio de viaj grandaj faroj, kaj eĉ pli longe vivu la viro, al kies laŭdinda intereso ŝuldiĝas, ke oni ĝin tradukis el la araba lingvo en la kastilian por universala distro de la regnoj.

Don Quijote igis lin stariĝi kaj diris:

—Ĉu vere do mia historio ekzistas, kaj ĝin verkis maŭra saĝulo?

—Tiel vere —respondis Sansón—, ke mi opinias, ke ĝisdate eldoniĝis pli ol dek du mil ekzempleroj de la libro; se ne, parolu Portugalio, Barcelona kaj Valencia, kie oni ilin presis. Eĉ cirkulas la famo, ke ankaŭ en Antverpeno oni presas nun la libron, kaj mi kredas, ke ne ekzistos regno, en kies lingvon oni ne tradukos ĝin.

—Unu el la aferoj, kiuj sendube donas la plejan plezuron al viro virta eminenta, konsistas en tio, vidi sin kun bona famo, tiel en la opinio de la homoj, kiel en la paĝoj de la libroj. Mi diras «kun bona famo», ĉar, se oni havus mavan, ajna morto preferindus.

—Rilate al la bona famo kaj reputacio —diris la bakalaŭro— nur via moŝto iras ĉe la antaŭo de la ceteraj vagantaj kavaliroj, ĉar la maŭro en sia lingvo, kaj la kristano en la sia, zorge kaj detale pentris la grandanimecon de via moŝto, vian kuraĝon en la danĝeroj, vian paciencon en la misfortunoj, vian eltenemon sub la sortobatoj kaj la vundoj, vian ĉaston kaj sindetenon en la bele platona amo de via moŝto kaj de sinjorino doña Dulcinea de El Toboso.

—Jam tie eraras la historio —interrompis Sancho—, ĉar mi neniam aŭdis la nomon de sinjorino Dulcinea kun la titolo «doña»; oni nomis ŝin simple nur sinjorino Dulcinea de El Toboso.

—Tia detalo ne gravas —diris Carrasco.

—Certe ne —respondis don Quijote—. Sed diru, sinjoro bakalaŭro, kiuj faroj miaj estas plej laŭdataj en la historio?

—Pri ili ekzistas diversaj opinioj, same kiel ekzistas diversaj gustoj —diris la bakalaŭro—. Kelkaj preferas la aventuron de la ventomuelejoj, kies aloj ŝajnis al via moŝto brakoj de Briareoj kaj de gigantoj; aliaj, la aventuron de la fulmarteloj; aliaj, la priskribon de la du armeoj poste aspektantaj kiel ŝafaroj; aliaj, pli ŝatas la rakonton pri la mortinto, kies kadavron oni portis survoje al Segovia por ĝia enterigo; aliaj asertas, ke la liberigo de la galeruloj superas ĉion ceteran; kaj ankoraŭ aliaj diras, ke nenio egalas al la du gigantaj benediktanoj kaj al la batalo kontraŭ la kuraĝa vasko.

—Diru, sinjoro bakalaŭro —interrompis Sancho—, ĉu en la libro troviĝas ankaŭ la aventuro de la janguanoj, kie la brava Rocinante kapricis peti de ulmo pirojn?^[229]

—La saĝulo nenion postlasis en sia inkujo —respondis Sansón—. Ĉion li notis kaj rakontis, eĉ la kapriolojn de nia bona Sancho sur la plejdo.

—Ne sur la plejdo mi kapriolis, sed en la aero, kaj eĉ pli ol mi volis —diris Sancho.

—Mi pensas, ke al nenia homa historio en la mondo mankas subiroj kaj supriroj, precipe en la historioj kavaliraj. Ili ne povas pleni nur de feliĉaj aventuroj —diris don Quijote.

—Tamen —respondis la bakalaŭro— kelkaj legintoj de la libro diras, ke ili pli kontentus, se la aŭtoro estus forgesinta nombron de la nekalkuleblaj batoj ricevitaj de sinjoro don Quijote en diversaj bataloj.

—Nu, tio apartenas al la vero de la historio —komentis Sancho.

—Sed li devintus prisilenti ilin, almenaŭ pro justeco —diris don Quijote—, ĉar ne ekzistas prava motivo rakonti incidentojn, kiuj ne ŝanĝas aŭ influas la veron de historio, des malpli se ili diskreditas la heroon. Certe Eneo ne montriĝis tiel pia, kiel Vergilio lin pentras, nek Uliso tiel prudenta, kiel lin priskribas Homero.

—Vi pravas —respondis Sansón—. Sed temas pri du aferoj tute diferencaj: verki kiel poeto kaj verki kiel historiisto. La poeto povas rakonti aŭ prikanti aferon, ne kia fakte ĝi okazis, sed kia ĝi devus okazi, dum la historiisto devas ĝin raporti, ne kia ĝi devus okazi, sed kia vere ĝi okazis, sen aldono aŭ depreno de io.

—Do, se ĉi sinjoro maŭro tenas sin al la vero —diris Sancho— certe inter la vergoj ricevitaj de mia mastro troviĝas ankaŭ la miaj, ĉar neniam oni mezuris per vergoj la dorson de mia sinjoro, sen ke oni same mezurus al mi la tutan korpon. Sed

ne mirinde, ĉar, kiel diras ĉi mastro mia, la membroj devas suferi la doloron de la kapo.

—Sarkasme vi parolas, Sancho —diris don Quijote—. Certe, al vi ne mankas memoro, kiam vi deziras ĝin havi.

—Eĉ se mi volus forgesi pri la vergoj ricevitaĵ —respondis Sancho— ilin memorigus al mi la lividoj, ankoraŭ freŝaj, sur miaj ripoj.

—Silentu, Sancho —ordonis don Quijote— kaj ne interrompu la sinjoron bakalaŭron. Li bonvolu daŭrigi, dirante kion oni rakontas pri mi en la menciita libro.

—Kaj pri mi —aldonis Sancho—, ĉar oni diras, ke ankaŭ mi rolas kiel unu el ĝiaj potaĝonistoj.

—«Protagonistoj», ne «potaĝonistoj», amiko Sancho —rimarkis Sansón.

—Nu, jen alia korektanto de vortoj! —diris Sancho—. Se oni daŭrigos, avertante min pri ili, neniam ni finos ĉi konversacion.

—Dio min damnu, Sancho, se vi ne estas la dua protagonisto de la libro —respondis la bakalaŭro—. Kelkaj eĉ opinias, ke la partoj, kie vi parolas, superas ĉion ceteran, eĉ se en ĝi intervenas la ĉefa persono; tamen, aliaj opinias vin tro naiva, tial, ke vi kredis realigebla vian regadon super la insulo al vi promesita de ĉi mastro via.

—Ankoraŭ Dio ne dormas —diris don Quijote—. Kun la paso de la tempo kreskos la sperto de Sancho, kaj li fariĝos pli kompetenta kaj lerta ol nun por funkcii kiel gubernatoro.

—Je Dio, sinjoro —respondis Sancho—. Se kun mia nuna aĝo mi ne povus regi insulon, mi ne regus ĝin eĉ kun la aĝo de

Metuŝelaĥ. La problemon kaŭzas, ne ke al mi mankas cerbo por regi insulon, sed ke tiu kaŝiĝas mi ne scias kie.

—Fidu Dion, Sancho —diris don Quijote—, kaj ĉio iros bone, eĉ pli bone ol vi pensas, ĉar eĉ ne unu folio moviĝas en sia arbo, se Dio ne volas.

—Kaj same veras —aldonis Sansón—, ke, se Dio volas, Sancho havos, ne unu, sed mil insulojn por regi.

—Mi vidis pli ol unu gubernatoron —respondis Sancho— kies meritoj ne atingis eĉ ĝis la plandumo de miaj ŝuoj; malgraŭe oni nomas ilin «via moŝto» kaj primetas al ili tablon kun servicoj el arĝento.

—Vi parolas pri gubernatoroj, ne de insuloj, sed de teritorioj facile regeblaj —diris Sansón—. La gubernatoroj de insuloj devas koni almenaŭ la gramatikon.

—Kun la «grama»^[230] mi aranĝus min facile —respondis Sancho— sed pri la «tiko» ne opinias, ĉar mi ne komprenas ĝian signifon. Sed ni lasu ĉi aferon de la regado en la manoj de Dio: Li scios meti min en la postenon, kie mi povos servi Lin pli bone. Mi volas diri al sinjoro bakalaŭro Sansón Carrasco, ke mi sentas egan kontenton, tial, ke la aŭtoro de la libro parolis pri mi tiel bele, ke liaj diroj ne tedas. Pli bone tiel, ĉar, je mia fido de lojala ŝildisto, se li skribus pri mi ion ne propran al oldkristano, kiel mi estas, eĉ la surdaj nin aŭskultus.

—Tio egalus al faro de miraklo —diris Carrasco.

—Miraklo aŭ ne miraklo —daŭrigis Sancho—, ĉiu zorgu kion li parolas aŭ skribas pri aliaj personoj, kaj ne rakontu iele-trapele la unuan aferon, kiu pasas al li tra la kapo.

—Interalie oni riproĉas al la libro —diris Carrasco—, ke ĝia aŭtoro enmetis en ĝin novelon titolitan *La stulta scivolo*. Oni kritikis, ne ke la novelo estas mava aŭ misrakontita, sed ke ĝi havas nenion komunan kun la historio de sinjoro don Quijote.

—Mi vetas —respondis Sancho—, ke ĉi aŭtoro filo de hundo miksis la brasikojn kun la napoj.^[231]

—Nun mi komencas kredi —diris don Quijote—, ke, ne saĝulo, sed stulta ĉarlatano, kaprice kaj sen ia metodo skribis la libron, lasante, ke el ĝi rezultu io ajn, laŭ la maniero de Orbaneja, la pentristo de Úbeda, kiu kutimis respondi, kiam oni demandis lin, kion li pentras: «Fariĝu kio volas». Eble li deziris pentri kokon, por ekzemplo, sed ĉe la fino ĝi vidiĝis tiel stranga kaj tiel diferenca de reala koko, ke li devis skribi apude per grandaj kaj klaraj literoj: «Ĉi tio estas koko». Kaj sendube la samo okazos al mia historio: ĝi bezonos komentarion, ke oni povu ĝin kompreni.

—Ne —respondis Sansón—, ĉar ĝi tre klaras kaj prezentas nenian komplikon. La infanoj ĝin foliumas; la knaboj ĝin legas; la plenaĝaj viroj ĝin gustumas, kaj la oldaj ĝin laŭdas. Unuvorte, ĝi estas tiel konata kaj tiel ripete legata kaj memorata de ĉiaj homoj, ke, apenaŭ vidiĝas skeleta ĉevalaĉo, oni diras: «Jen Rocinante!». Legi ĝin plej amas la paĝioj. Ne troviĝas antaŭĉambro de moŝtulo sen ekzemplero de *Don Quijote*; se iu lasas ĝin, alia ĝin prenas; kelkaj ĝin petas, aliaj sin ĵetas al ĝi. Resume, ĉi libro estas unu el la plej agrablaj kaj honestaj distroj ĝis nun konataj, ĉar en ĝi nenie troveblas eĉ io simila al esprimo nedeca aŭ al penso nekatolika.

—Skribi alie —diris don Quijote— egalus skribi, ne verojn, sed mensogojn. Kaj la historiisto helpanta sin per mensogoj devus suferi, kiel la monfalsistoj, la punon bruli en fajro. Mi

vere ne komprenas, kio movis la aŭtoron enmeti novelojn kaj rakontojn senrilatajn al la historio, malgraŭ tio, ke li havis ankoraŭ tiom da temoj pri mia persono indaj sidi en la libro. Sendube li tenis sin al la proverbo: «Ĉu de pajlo, ĉu de fojno, la ventro plenu».^[232] Vere, se li limiĝus nur al miaj pensoj, al miaj suspiroj, al miaj larmoj, al miaj honestaj deziroj kaj al miaj entreprenoj, li verkintus volumon pli dikan ol ĉio skribita de El Tostado,^[233] aŭ almenaŭ tiel dikan. Fakte, sinjoro bakalaŭro, mi komprenas, ke, por komponi historion aŭ libron de ajna speco, necesas granda talento kaj matura juĝokapablo. Verki sprite kaj humure postulas genion; la plej saĝa rolo en komedio estas la rolo de stultulo, ĉar, por ŝajnigi sin idiota, oni devas ne esti tia. Rilate al la historiaj verkoj, ili havas ian sakralan karakteron, se konsideri, ke ili devas diri la veron, kaj, kie troviĝas la vero, tie troviĝas Dio. Malgraŭ ĉio ĉi, ekzistas personoj, kiuj skribas kaj eldonas libron facile kaj senĝene kvazaŭ ili farus benjetojn.

—Nenia libro tiel mavas, ke ĝi ne havas ion bonan —diris la bakalaŭro.

—Sendube —respondis don Quijote—. Sed ofte, aŭtoroj atingas ĝustan famon per siaj verkoj, sed ĝin perdas, aŭ almenaŭ ĝin kompromitas, eldoninte ilin.

—Tio okazas —diris Sansón— ĉar oni povas ekzameni laŭplaĉe presitan verkon kaj sekve, troveblas pli facile ĝiaj eraroj: kaj ju pli famas aŭtoro, des pli oni funde esploras lian verkon. Renomaj genioj, grandaj poetoj kaj gloraj historiistoj ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam, provokas la envion de personoj, kies plezuro kaj speciala distro konsistas en tio, juĝi la librojn de aliaj, kvankam ili mem nenion propran kreas por la publiko.

—Ne strange —respondis don Quijote—. Multegaj teologoj ne taŭgas por paroli de kirka katedro, sed ege lertas por eltrovi la mankojn kaj ekscesojn de la predikistoj.

—Vi pravas, sinjoro don Quijote —diris Carrasco—. Sed mi tre ĝojus, se tiaj kritikantoj montriĝus pli grandanimaj kaj malpli rigoraj kaj ignorus la makuletojn de suno, kontraŭ kies granda brilo ili murmuris. Ĉar, kvankam *aliquando bonus dormitat Homerus*,^[234] ili pensu, kiel longe li tenis sin vekita por doni al ni la lumon de sia verko kun kiel eble plej malmulte da ombroj. Kaj povus okazi, ke la ŝajnaj makuloj efektive estas belgrajnoj, kiaj kelkfoje pliigas la ĉarmon de vizaĝo; tial mi pensas, ke la aŭtoroj elmetas sin al ega risko, kiam ili publikigas ion, ĉar tute neblas verki libron kapablan doni kontenton al ĉiuj legantoj.

—La libro pri mi sendube plaĉas al malmultaj —diris don Quijote.

—Tute kontraŭe: same kiel *stultorum infinitus est numerus*,^[235] ankaŭ la nombro de la ŝatantoj de via historio estas nekalkulebla; tamen, kelkaj riproĉis al la aŭtoro ties mankon de memoro, ĉar li forgesis diri, kiu ŝtelis de Sancho la azenon. En la libro oni ne deklaras tian fakton, kaj la leganto komprenas nur, ke la ŝtelo okazis; tamen iom poste aperas Sancho sur la sama azeno, kvankam oni ne diras, ke oni ĝin retrovis. Oni riproĉas ankaŭ, ke la aŭtoro forgesis diri kion faris Sancho kun la cent eskudoj, kiujn li prenis el la valizo de Sierra Morena, ĉar oni ne plu mencias ilin; kaj multaj deziras scii, kion li faris kun ili, aŭ kiel li ilin elspezis.

—Nun, sinjoro Sansón —respondis Sancho—, mi ne fartas sufiĉe bone por fari raporton aŭ rakonton; mi eksentas tian doloron en la stomako, ke se mi ne kvietigos ĝin per du glutoj da olda vino, mi vidiĝos kiel la dorno de Sankta Lucía.^[236] Hejme mi havas la vinon; la edzino min atendas; kiam mi finos manĝi, mi revenos kaj respondos al via moŝto, kaj al ajnaj kromaj personoj, ĉian demandon rilate la perdon de la azeno kaj la elspezon de la cent eskudoj.

Kaj sen atendi respondon kaj sen diri alian vorton li foriris hejmen. Don Quijote petis la bakalaŭron sidiĝi kun li ĉe la manĝotablo, la bakalaŭro akceptis la inviton, oni aldonis du pliajn kolombidojn al la ordinaraj pladoj, oni traktis dum la manĝo pri kavaliraĵoj, Sansón agordiĝis al la humoro de don Quijote, finiĝis la bankedo, siestis la du viroj, revenis Sancho, kaj oni rekomencis la pasintan konversacion.

[227] Hispana formo de Ŝimŝom.

[228] La kostumo de Sankta Petro estis speco de uniformo de la tiamaj studentoj, simila al la kostumo tiam uzata de la pastroj kaj konsistanta, interalie, el sutano, mantelo kaj nigra ĉapo. Oni ne bezonis la ricevon de ordinoj por porti ĝin, do la ĵuro de la bakalaŭro havas ŝercan nuancon.

[229] Hispana proverbo: voli ion neeban. Sancho aludas, ke en la aventuro de la janguanoj (ĉapitro 15-a de la unua parto) Rocinante eksentis amoremon al iliaj ĉevalinoj, kaj ke ĝi ne plu havis tiam fizikan kapablon por plenumi sian deziron.

[230] En la hispana: herbo.

[231] Proverba esprimo: enkonduki en aferon, ion senrilatan al ĝi.

[232] Proverbo: deziri nur fini aŭ kompletigi ion, ne atentante la metodon nek la kvaliton.

[233] Alnomo de Alonso de Madrigal (mortis en 1450), aŭtoro de multegaj libroj en la latina kaj hispana.

[234] Latinaĵo: «eĉ la bona Homero kelkfoje dormetas».

[[235](#)] Latinaĵo: «la nombro de la stultuloj estas senfina».

[[236](#)] Proverba esprimo. Se Sancho ne riparus sian stomakon, li ne povus manĝi kaj fariĝus senkarna kiel dorno.

Ĉapitro 4

Kie Sancho Panza respondas la demandojn de la bakalaŭro Sansón Carrasco, dispelante ties dubojn, kun aliaj aferoj indaj esti konataj kaj rakontataj

Revenis Sancho al la domo de don Quijote kaj rekomencis tiel la antaŭan konversacion:

—Sinjoro Sansón diris, ke oni deziras scii, kiu ŝtelis mian azenon, kaj kiel kaj kiam okazis la ŝtelo. Mi respondas, dirante, ke en la sama nokto, kiam, forkurante de la Santa Hermandad, ni alvenis al Sierra Morena post la senfortuna aventuro de la galeruloj kaj la renkontiĝo kun la kadavro portata al Segovia, mia sinjoro kaj mi penetris en densejon, kie li apogate al la lanco, kaj mi sur la azeno, dormis, tute lacaj kaj pistitaj kaŭze de la pasintaj bataloj, kvazaŭ ni kuŝus sur kvar matracoj el plumoj. De mia flanko, mi dormis tiel profunde, ke la ŝtelisto, kiu ajn li estis, povis trankvile proksimiĝi, fiksi kvar stangojn sub la kvar anguloj de la ŝarĝo-selo, tiamaniere, ke li sukcesis elpreni de sub mi la azenon, kaj, sen ke mi sentus ion, li lasis min sidanta rajde sur nur la selo.

—Temas pri io facila kaj cetere ne nova —diris don Quijote—. La samo okazis al Sacripante ĉe la sieĝo de Albraca: la fama ŝtelisto Brunelo, uzante la saman sistemon, elprenis el inter liaj kruroj lian ĉevalon.

—Venis la matenruĝo —daŭrigis Sancho— kaj apenaŭ mi faris moveton, la stangoj ŝanceliĝis kaj falis, kaj mi forte frapiĝis kontraŭ la tero. Mi serĉis per la rigardo la azenon, sed ĝin ne trovis; miaj okuloj komencis larmi, kaj mi tiel

veadis, ke, se la aŭtoro de nia historio ne notis tion, li certu, ke li skribis nenion valoran. Post mi ne scias kiom da tagoj, vojaĝante kun la sinjorino princino Micomicona, mi rekonis mian azenon kaj vidis rajdi sur ĝi la grandegan friponon kaj mensogan Ginés de Pasamonte en cigana kostumo, la saman ulon, kiun mia mastro kaj mi liberigis el liaj ĉenoj.

—Ne tie kuŝas la eraro —respondis Sansón— sed en la fakto, ke laŭ la aŭtoro, Sancho rajdis la azenon antaŭ ol li retrovis ĝin.

—Al tio mi ne scias kion respondi —diris Sancho—. Eble la historiisto trompiĝis, aŭ eble temas pri eraro de la presisto.

—Sendube io tia okazis —diris Sansón—. Sed kio fariĝis el la cent eskudoj?

—Ili malfariĝis —respondis Sancho—. Mi ilin elspezis por mi mem, mia edzino kaj miaj filoj, kaj, kaŭze de la eskudoj, mia edzino toleris kun pacienco mian vagadon sur vojoj kaj padoj je la servo de mia sinjoro don Quijote; ĉar, se post tiom da tempo mi revenus hejmen sen mono kaj sen la azeno, nigra sorto atendus min. Se oni deziras scii de mi ion plian, nu, mi pretas respondi eĉ al la reĝo mem en persono, kvankam estas nenies koncerno, ĉu mi prenis kaj elspezis, aŭ ĉu mi nek prenis nek elspezis: se oni pagus per mono la batojn de mi ricevitaĵoj en ĉi vagadoj, kaj ĉiun baton taksus po kvar maravedoj, ne sufiĉus cent eskudoj pliaj por pagi la duonon de la batoj; la homoj lasu sian konsciencon paroli kaj ne juĝu la blankon nigra, aŭ la nigron blanka; ĉiu estas kia Dio lin faris, kaj multokaze eĉ pli mava.

—Mi zorgos sciigi la aŭtoron de ĉi historio —diris Carrasco—, ke, se oni presigos ĝin denove, li ne forgesu enmeti kion nia bona Sancho ĵus diris: per ĝi li levos la libron eĉ al pli alta nivelo.

—Ĉu ekzistas aliaj korektindoj en la rakonto, sinjoro bakalaŭro? —demandis don Quijote.

—Eble jes —li respondis—, sed sendube ne tiel gravaj kiel la jam menciitaj.

—Ĉu la aŭtoro ne anoncas la aperon de dua parto? —demandis don Quijote.

—Jes —respondis Sansón—, sed li asertas, ke li ne trovis ĝin, nek scias kiu ĝin havas, do ni ne scias, ĉu ĝi fine aperos aŭ ne. Cetere, kelkaj diras, ke «duaj partoj neniam bonas», kaj aliaj, ke «pri la aventuroj de don Quijote jam sufiĉas la unua parto», do oni dubas, ĉu ni havos la daŭrigon de la historio. Tamen, personoj pli jovialaj ol saturnaj, diras: «Ni volas pli da kiĥotaĵoj; ataku don Quijote, parolu Sancho, kaj rezultu io ajn».

—Kaj kion pensas fari la aŭtoro? —demandis don Quijote.

—Kion? Nu, kiam li trovos la historion, kies serĉadon li daŭrigas kun eksterordinaraj klopodoj, li tuj eldonos ĝin, puŝite pli de la ebla profito, ol de la deziro ricevi ajnan laŭdon.

—Ĉu la aŭtoro rigardas unue la monon kaj la profiton? —diris Sancho—. Mirinde se li sukcesos kun tia ideo, ĉar li faros nenion alian ol rapidi kaj sin peli, kiel la tajloroj en la antaŭtagoj de la Pasko: kaj la verkoj haste faritaj neniam finiĝas tiel perfektaj, kiel necesas. Ĉi sinjoro maŭro, aŭ kion ajn li estas, zorgu kaj atentu, ĉar mi kaj mia mastro povus provizi lin per tiom da aventuroj kaj diversaj eventoj, ke li povus komponi, ne nur unu duan parton, sed cent. Sendube pensas la bonulo, ke ni dormadas ĉi tie sur la pajlo; sed li provu tikli nin, kaj li vidos, ĉu vere ni dormas. Cetere, se mia mastro sekvus mian konsilon, ni devus jam troviĝi sur la

vojoj de la mondo, riparante arbitrojn kaj korektante misojn, laŭ la kutimo kaj la maniero de la bonaj vagantaj kavaliroj.

Apenaŭ Sancho finis paroli, aŭdiĝis henoj de Rocinante; ili ŝajnis al don Quijote tre feliĉa aŭguro, do li decidis fari alian eliron post tri aŭ kvar tagoj. Tiel do, li komunikis sian intencon al la bakalaŭro kaj petis de li konsilon pri la loko, kien li devus iri unue; la bakalaŭro respondis, ke li direktu sin al la urbo Zaragoza en la regno Aragón, kie, post kelkaj tagoj, oni aranĝus superbajn turnirojn, kaj en ili li povus famiĝi super la kavaliroj aragonaj, kio egalus famiĝi super la kavaliroj de la tuta mondo. Li laŭdis la hidalgon pro ties kuraĝega kaj nobla decido, sed rekomendis lin teni sin pli singarda antaŭ la danĝeroj, ĉar lia vivo apartenis, ne al li, sed al la personoj, kiuj bezonis lian helpon kaj protekton en siaj misfortunoj.

—Ankaŭ mi plendas pri tio, sinjoro Sansón —diris Sancho—, ĉar mia mastro atakas cent armitajn virojn, tiel senhezite kiel frandema knabo seson da melonoj. Je Dio, sinjoro bakalaŭro! Foje konvenas ataki, foje retiri sin, kaj ne ĉiam oni devas krii: «Santiago! Kontraŭ ilin, Hispanio!».^[237] Mi aŭdis diri, eble ankaŭ al mia propra sinjoro, se mi bone memoras, ke inter la ekstremoj de la poltrona kaj la temerara, troviĝas la meza vojo de la kuraĝa; se tiel do, mi volas, nek ke li fuĝu sen ia motivo, nek ke li ataku, kiam la situacio postulas alian rimedon. Sed mi deziras aparte emfazi al mia sinjoro, ke, se li volas preni min kun si, li devas promesi batali ĉiam sola, kaj ke mi okupiĝos pri li, certe kun granda volonto, nur rilate al lia tualetto kaj lia manĝo; sed se li imagas, ke mi devos helpi lin per la glavo, eĉ se nur kontraŭ friponaj kampulaĉoj el tiuj kun hakilo kaj kapuĉo, li imagas neeblon. Mi havas la intencon gajni por mi la famon ne de kuraĝa, sinjoro Sansón, sed de la plej bona kaj plej lojala ŝildisto iam servinta al vaganta kavaliro; kaj se rekompence por miaj multaj kaj bonaj servoj, mia sinjoro don

Quijote volus doni al mi ajnan insulon el la multaj, kiujn, laŭ via moŝto, li renkontos tuj trans la pordo, mi tre dankus lin; kaj, se fine mi ne ricevus ĝin, nu, mi naskiĝis homo, kaj la homoj devas fidi nur je Dio; se mi ne fariĝos gubernatoro, la pano bongustos al mi same kiel nun, aŭ eĉ pli. Kaj, kiel mi scius, ĉu en tiaj gubernatorecoj la diablo ne faligus min per krurfalĉo, por ke mi rompu al mi la kapon? Mi naskiĝis Sancho, kaj mi volas morti Sancho. Tamen, se facile kaj senĝene, sen grandaj klopodoj kaj riskoj de mia flanko mi ricevus de la ĉielo la donacon de insulo aŭ de simila afero, mi ne estus tiel stulta rifuzi ĝin: ĉar oni diras ankaŭ, ke «se oni al vi proponas ringon, jam pretigu la fingron» kaj ke «bono venu, kaj al mi sin premu».

—Frato Sancho —diris Carrasco—. Vi parolis kiel profesoro. Tamen, fidu al Dio kaj al sinjoro don Quijote, kiu donos al vi, ne unu insulon, sed unu regnon.

—Ne gravas, ĉu mi ricevus pli aŭ malpli —respondis Sancho—. Sed mi povas certigi al sinjoro Carrasco, ke mia mastro, donante al mi regnon, ne ĵetus ĝin en senfundan sakon, ĉar mi palpis al mi la pulson kaj trovis, ke mi fartas sufiĉe bone por regi regnon aŭ mastrumi insulon. La samon mi jam diris al mia mastro en aliaj okazoj.

—Atentu, Sancho —diris Sansón—, ke la postenoj ŝanĝas la personon, kaj, se vi vidus vin gubernatoro, eble vi ignorus eĉ la patrinon, kiu vin enmondigis.

—Tion oni povus atendi de homoj mizernaskitaj, sed ne de personoj kun oldkristana sango, kiel mi —respondis Sancho—. Kaj se vi konsiderus mian naturon, vi komprenus, ke mi povas montriĝi sendanka al neniu.

—Dio ĝin volu —diris don Quijote—. Ni vidos, ĉu tiel okazos, kiam la regno venos: ĉar, ŝajnas al mi, ĝi duonaperas jam

antaŭ miaj okuloj.

Poste la hidalgo sin turnis al la bakalaŭro, kaj diris, ke, se okaze li estas poeto, li bonvolu komponi poemon traktantan pri lia intencita adiaŭdiro al lia sinjorino Dulcinea de El Toboso, metante unu literon de ŝia nomo en la komenco de ĉiu verso. tiel, ke, ĉe la kompleta poemo, la inicialoj formu la vortojn Dulcinea de El Toboso.

La bakalaŭro respondis, ke, kvankam oni ne povus enkalkuli lin en la grupon de la famaj hispanaj poetoj —laŭŝajne ekzistis da ili ne pli ol tri kaj duono— tamen li certe verkus la poemon, malgraŭ tio, ke li vidis tre komplika ĝian komponon, ĉar la nomo konsistis el dek sep literoj: en kvar strofoj kvarversaj, aŭ koploj, truis unu litero, kaj en kvar strofoj kvinversaj mankus tri literoj; por solvi la problemon li klopodus iel ignori unu literon, tiel ke en kvar koploj legiĝu la nomo, eĉ se ne tute kompleta, de Dulcinea de El Toboso.

—Faru ĝin laŭeble —diris don Quijote—, ĉar se ŝia nomo ne vidiĝas klara kaj evidenta, neniu virino kredas, ke oni verkis por ŝi poemon al ŝi dediĉitan.

Ili interkonsentis pri ĉi punkto kaj ankaŭ pri tio, ke la eliro devus okazi post ok tagoj. Don Quijote rekomendis al la bakalaŭro prisekreti la aferon, precipe antaŭ la pastro, majstro Nicolás, la nevino kaj la mastrumantino, ke ili ne obstaklu lian noblan kaj kuraĝan decidon. Carrasco ĉion promesis, kaj de sia flanko petis de la kavaliro, ke li ne forgesu skribi informadi lin pri siaj futuraj aventuroj kaj misaventuroj, se li havos tempon por tiaj sciigoj. Poste ili adiaŭis unu la alian, kaj Sancho iris prepari ĉion necesan por la vojaĝo.

[[237](#)] Batalkrio de la hispanoj kontraŭ la araboj, kiuj invadis ilian landon en la 8-a jarcento. «Santiago» estas la hispana formo de Sankta Jakobo, nacia patrono de Hispanio.

Ĉapitro 5

Pri la saĝa kaj sprita konversacio inter Sancho Panza kaj ties edzino Teresa Panza, kun aliaj eventoj memorindaj

Kiam la tradukisto de nia historio finis skribi ĉi kvinan ĉapitron, li diris, ke li opinias ĝin apokrifa, ĉar Sancho Panza esprimas sin en ĝi per supera stilo ne atribuebla al lia kurta komprenemo kaj per rimarkoj tiel subtilaj, ke ŝajne ili ne povis origini en lia kapo; tamen, por fidele plenumi sian devon, la tradukisto decidis ne formeti la ĉapitron, do li daŭrigis jene:

Sancho alvenis al si tiel ĝoja kaj feliĉa, ke lia edzino, rimarkinte lian humoron je la distanco de ŝtonĵeto, ne povis ne demandi:

—Kio estas la afero, Sancho, ke vi venas tiel ĝoja?

—Se Dio volus, edzino, ne plaĉus al mi montriĝi tiel ĝoja, kiel mi aspektas —li respondis.

—Mi ne komprenas vin, edzo —ŝi diris— kaj ne scias kion vi signifas per tio, ke se Dio volus, ne plaĉus al vi montriĝi tiel ĝoja, kiel vi aspektas. Eble mi estas stulta, sed mi ne scias, ke oni povas ĉagreniĝi pro sia propra ĝojo.

—Aŭskultu, Teresa —respondis Sancho—. Mi ĝojas, ĉar mi decidis denove servi mian mastron don Quijote. Li volas eliri por la tria fojo serĉi aventurojn: kaj devigite, kiel en la antaŭa okazo, tiel same de la malriĉo kiel de la espero trovi aliajn cent eskudojn, mi akompanos lin, kvankam min afliktas, ke mi devos disigi min de vi kaj de miaj filoj. Se Dio

bonvolus nutri min, sen elmeti min al ajna risko, kaj sen ke mi bezonus vagadi ekster la hejmo sur montoj kaj sur valoj (kaj tion Li povus fari facile kaj senkoste per nur Sia deziro), kompreneble mi multe pli feliĉus, ĉar mia nuna ĝojo miksiĝas kun la tristo vin forlasi; do mi ĝuste diris, ke, se Dio volus, mi ĝojus, se mi ne sentus kontenton.

—Aŭskultu, Sancho —diris Teresa—. De kiam vi fariĝis membro de vaganta kavaliro, vi parolas tiel rebuse, ke oni ne povas vin kompreni.

—Sufiĉas, ke Dio komprenas min, edzino —respondis Sancho—. Li komprenas ĉion... kaj punkto. Sed memoru, ke en la venontaj tri tagoj, vi devos bone zorgi la azenon, ke ĝi vidiĝu fortika kaj vigla: duobligu ĝian porcion da furaĝo kaj ekzamenu la staton de la ŝarĝo-selo kaj de la harniso, ĉar ni iros ne por festi ajnan edziĝon, sed por vagadi tra la mondo spite al gigantoj, drakoj kaj aliaj monstroj kaj por aŭdi nombron da sibloj, roroj, muĝoj kaj beoj, kio certe egalus al kisoj kaj karesoj, se ni povus eviti trakti kun janguanoj kaj ensorĉitaj maŭroj.

—Mi bone vidas, edzo —diris Teresa—, ke la vagantaj ŝildistoj ricevas sian panon ne por nenio, do mi preĝos al Nia Sinjoro, ke Li tuj eltiru vin el ĉia misfortuno.

—Mi diras al vi, edzino —respondis Sancho—, ke mi falu morta ĉi tie, se mi ne esperas baldaŭ fariĝi gubernatoro de ia insulo.

—Ho ne, kara —diris Teresa—. Plu vivu la kokino eĉ kun sia pipso:^[238] vi vivu, kaj la diablo forportu ĉian gubernatorecon de la mondo. Vi elvenis sen gubernatorecoj el la ventro de via patrino, sen ili vi vivis ĝis nun, kaj sen ili vi iros (aŭ oni vin portos) al la tombo, kiam Dio volos. En la mondo ekzistas personoj, al kiuj mankas gubernatorecoj, sed ili plu vivas kaj

apartenas al la homa gento. La malsato estas plej bona spico de la mondo kaj ĉiama akompananto de la senhavuloj: tial ili manĝas kun apetito. Tamen, Sancho, se hazarde vi fariĝus gubernatoro, ne forgesu min kaj viajn filojn. Pensu, ke Sanchico havas jam dek kvin jarojn, kaj ke li devus iri al la lernejo, se efektive lia onklo la abato volas, ke li fariĝu ekleziulo. Pensu ankaŭ, ke Marisancha, via filino, ne tro ĉagreniĝos, se mi edzinigos ŝin: mi komencas suspekti, ke ŝi deziras havi edzon tiel forte, kiel vi insulon; kaj fine, pli dece ŝajnas filino kun mava edzo ol kun bona konkubo.

—Certe, edzino —respondis Sancho—, se Dio faros min gubernatoro de ajna loko, mi edzinigos Marisanchan al tia rangulo, ke oni devos alparoli ŝin per la titolo de, almenaŭ, «sinjorina moŝto».

—Ne, Sancho, ne —diris Teresa—. Estos pli prudente edzinigi ŝin al viro de ŝia sama stato, ĉar se vi prenas ŝin de ŝiaj ŝuaĉoj al moŝtaj piedvestoj, de ŝia lana korsaĵo al krinolino kaj al parada jupo silka, de ŝia nomo Marica kaj de ŝia «ci» al sinjorino Tia kaj al «via sinjorina moŝto», la knabino ne konos sin mem kaj ĉiupaŝe faros mison, montrante, ke ŝi estas tajlita el ŝtofo kruda kaj vulgara.

—Silentu, stulta —respondis Sancho—. Post du tri jaroj da praktiko, ŝi posedos tian sinjorinecon kaj aplombon, ke ili ŝajnos denaskaj. Kaj se ne, kiom gravos? Ŝi estu «sinjorina moŝto», kaj ni ne zorgu pri io alia.

—Tenu vin al via stato, Sancho —diris Teresa—. Ne provu tiel alten levi vin kaj memoru la proverbon: «Edziĝo najbara garantias de eraro». Bela afero, vere, edzinigi nian Marisanchan al grafego aŭ al impona kavaliro! Kiam li kapricus, li insultus ŝin, nomante ŝin kampuleca, filino de tretanto de gleboj kaj de turnantino de ŝpinradoj! Ha ne! Ne tiel okazos, edzo. Ne por tio mi vartadis mian filinon. Vi

alportu monon hejmen, kaj lasu al mi la zorgon edzinigi ŝin: mi pensas pri Lope Tocho, la filo de Juan Tocho, junulo sana kaj fortika; ni konas lin, kaj mi rimarkas, ke li rigardas ŝin kun plaĉo; kun li, nia egalulo, ŝi faros bonan edziniĝon, kaj ni ne perdos ŝin el la vido; ni ĉiam estos kune, patroj kaj filoj, nepoj kaj bofiloj, kaj la beno kaj la paco de Dio nin akompanos. Pli bone tio, ol ke vi edzinigu ŝin en ajna kortego aŭ palaco, kie ŝi nek komprenos ion, nek estos komprenata.

—Jam sufiĉas, besto, virino de Barabaso! —respondis Sancho—. Kial vi volas, sen ajna motivo, oponi ke mi edzinigu mian filinon al viro dononta al mi nepojn kun la titolo de «sinjora moŝto»? Aŭskultu, Teresa, mi ĉiam aŭdis al la olduloj diri, ke, kiu ne scias profiti sian bonan sorton, kiam ĝi alvenas al li, ne devus plendi, se ĝi preterpasas; kaj nun, kiam la sorto frapas sur nia pordo, ne konvenas teni ĝin fermita. Ni navigu sub la favora vento blovanta nian velon.

(Kaŭze de ĉi esprimoj, kaj de aliaj rimarkoj diritaj de Sancho tuj sekve, la tradukisto de nia historio opinias ĉi ĉapitron apokrifa).

—Ĉu vi pensas, bestaĉo —daŭrigis Sancho—, ke ne konvenus al mi trafi ian profitigan postenon gubernatoran, kie ni povus eltiri la piedon el la koto?^[239] Marisancha edziniĝu al viro de mia elekto, kaj vi vidos, ke oni nomos vin doña Teresa Panza, kaj ke vi sidiĝos en la kirko sur tapiŝoj kaj kusenoj spite al ĉiuj damoj de la vilaĝo. Ĉu vi preferas resti ĉiam en la sama loko, sen kreski kaj moviĝi, kiel ornama figuro? Pri la afero, do, oni ne plu parolu: Marisancha estos dukino, kiom ajn vi protestos.

—Ĉu vi scias kion vi diras, edzo? —respondis Teresa—. Mi kredas, ke tia dukolando kaŭzos la perdiĝon de mia filino. Faru ŝin dukino aŭ princino laŭ via plaĉo, sed sciu, ĝi okazos

sen mia aprobo kaj konsento. Mi amis ĉiam la egalecon, kaj ne povus toleri nefundamentitan orgojlon. Oni baptis min Teresa, nomo nuda kaj simpla, sen aldonoj, ornamoj kaj postiĉoj de «don» aŭ «doña». Mia patro nomiĝis Cascajo, sed, ĉar mi estas via edzino, oni nomas min Teresa Panza, anstataŭ, pli ĝuste, Teresa Cascajo: sed tien iras leĝoj, kien volas reĝoj. Tamen mi kontentas je mia nomo kaj je tio, ke ĝi ne bezonas la almeton de ia «doña» tro peza por mi. Se mi aperus en kostumo de grafino aŭ de edzino de gubernatoro, mi ne volus, ke la homoj diru: «Vidu, kiel paradas ĉi porkino: hieraŭ ŝi ne ĉesis disfibri stupon, ĉeestis la meson kovrinte al si la kapon, ne per la mantelo, sed per la jupo de la vesto, kaj jam hodiaŭ pavaĉas en krinolinoj kaj broĉoj... kvazaŭ ni ne konus ŝin!». Se Dio volos, ke mi konservu miajn sep aŭ kvin sensojn (aŭ kiom da ili mi havas), mi ne pensas doni al la homoj la okazon, ke ili vidu min en tia situacio. Vi, edzo, oficu gubernatore aŭ insulmastre, tute laŭ via plaĉo, sed mi ĵuras je la vivo de mia patrino, ke nek mi nek mia filino faros eĉ unu solan paŝon ekster nia vilaĝo. Virta virino straton ne konas, kaj por knabino honesta, laboro estas festo. Foriru kun via don Quijote al viaj aventuroj, kaj lasu nin kun niaj misaventuroj, ĉar Dio protektos nin, se ni bone kondutos; kaj rilate al via mastro, mi ne scias, kiu almetis al li ties «don»: ja nek lia patro, nek lia avo ĝin havis.

—Nun mi diras —respondis Sancho—, ke vi havas la diablon en la korpo. Je Dio, virino, kiom da absurdoj vi alpinglis, unuj al la aliaj! Kion komunan havas Cascajo, la broĉoj, la proverboj kaj la orgojlo kun miaj diroj? Aŭskultu, idiota, stulta (kaj mi povas nomi vin tio, ĉar vi forkuras de la bona sorto kaj ne komprenas miajn vortojn), se mi ordonus mian filinon ĵeti sin de la supro de turo, aŭ vagadi tra la mondo, kiel deziris vagadi la infantino doña Urraca, vi pravus, oponente al mia volo; sed, se en la daŭro de palpebrumo aŭ de fingroklako mi metas sur ŝin ian «doña» kaj ian «sinjorina moŝto» kaj prenas ŝin el inter la stoploj kaj ŝin sidigas sub

baldakeno kaj en *estrado* provizita per pli da veluraj kusenoj, ol da maŭroj ekzistas en la familio Almohadas de Maroko, kial vi obstinas oponi al mia volo?

—Ĉu vi deziras scii kial, edzo? —respondis Teresa—. Pro la proverbo, kiu diras: «Kio vin kovras, vin rivelas». La homoj apenaŭ ĵetas rigardon sur la senhavaj, sed fiksas ĝin sur la riĉaj; kaj se la riĉa iam estis mizera, tuj komenciĝas la klaĉoj, la rikanoj kaj la senfinaj mokoĵoj de la kalumniantoj, tiel abundaj sur la stratoj, kiel abeloj en svarmo.

—Aŭskultu, Teresa, kion mi volas diri nun al vi. Eble vi neniam aŭdis ion similan. Mi ne parolas el propra scio kaj nur ripetas la opiniojn de la pastro, kiu predikis en ĉi vilaĝo en la lasta Karesmo. Se mi bone memoras, li diris, ke ĉio nune rigardata de niaj okuloj fiksiĝas pli vive kaj daŭre en la memoro ol la aferoj de la paseo.

(La tradukisto de nia historio denove pensas, ke ĉi ĉapitro estas apokrifa, ĉar la esprimoj de Sancho superas ĉi tie lian mensan kapablon).

—De tio venas —li daŭrigis—, ke, kiam ni vidas personon en riĉe garnita kostumo kaj kun luksa akompano de servistoj, ŝajnas, ke tia pompo nin movas kaj devigas fari omaĝon al li, eĉ se en la sama momento mi memoras pri lia basa stato iama: ĉar la misfortuno de la mizero aŭ de la naskiĝo en senranga familio apartenas al paseo, do ne plu ekzistas; kaj ekzistas nur tio, kion ni vidas en la nuno. Tiel do, se la fortune levis personon (tiel diris la pastro) de lia basa situacio al la alto de lia prospero, kaj li kondukas ĝentile kaj afable al ĉiuj, sen pretendi rangi kiel egala al homoj de tradicie nobelaj familioj, estu certa, Teresa, ke oni tute ne memoros lian antaŭan staton; kaj ĉiuj respektos lin pro lia nuna konduto, se escepti la enviajn personojn, kontraŭ kies malico neniu bonsortulo povas konsideri sin sekura.

—Mi ne komprenas vin, edzo —respondis Teresa—. Faru laŭ via plaĉo kaj ne plu rompu al mi la kapon per viaj retorikoj kaj deklamoj; kaj se vi ostinas fari kion vi volas...

—«Obstinas» vi devas diri, ne «ostinas» —korektis Sancho.

—Ne komencu disputi kun mi —respondis Teresa—. Mi parolas, kiel Dio volas, ke mi parolu, kaj mi ne deziras miksiĝi en komplikojn. Mi diras nur, ke se vi firme decidis fariĝi gubernatoro, bonvolu preni kun vi vian filon Sancho, ke jam dekomence li lernu regadi: ĉar konvenas, ke la filoj lernu kaj heredu la oficon de siaj patroj.

—Kiam mi estos gubernatoro, mi vokos lin al mia flanko per poŝto, kaj ankaŭ sendos al vi monon, ĉar ĝi ne mankos al mi: ĉiam ekzistas personoj pretaj prunti monon al gubernatoroj, kiam ili ĝin bezonas. Kaj vestu la knabon tiel, ke li vidiĝu, ne kia li estas, sed kia li devas aspekti.

—Vi sendu monon —diris Teresa— kaj mi vestos lin tiel bela, ke li ŝajnos vera floro.

—Nu, bone, ni interkonsentas, ke nia filino edziniĝos al duko —insistis Sancho.

—En la sama tago, kiam mi vidos ŝin dukino —respondis Teresa—, mi ricevos la impreson, ke ŝi mortis. Sed mi diras denove, ke vi faru laŭ via plaĉo: ĉar ni, virinoj, naskiĝas kun la peza devo obei la edzon, eĉ se li estas azeno.

Tiam ŝi komencis plori tute afliktita, kvazaŭ ŝi jam vidus Marisanĉan morta kaj en la tombo. Sancho konsolis ŝin, dirante, ke certe ŝi estos dukino, sed ke li klopodos prokrasti kiel eble plej multe ŝian dukiniĝon. La konversacio finiĝis per tio, kaj Sancho denove vizitis la hidalgon por trakti kun li pri ilia proksima eliro.

[238] Proverbo: oni diras pri personoj aŭ aferoj necesaj, eĉ se ili havas mankojn.

[239] Proverba esprimo: eltiri sin el malriĉa vivo.

Ĉapitro 6

Temas pri tio, kio okazis inter don Quijote, lia nevino kaj lia mastrumantino, kaj estas unu el la plej gravaj ĉapitroj de ĉi historio

Dum Sancho Panza kaj lia edzino Teresa tenis la absurdan babiladon ĵus rakontitan, la nevino kaj la mastrumantino de don Quijote ne restis neniofare, ĉar mil signoj igis ilin suspekti, ke ilia onklo kaj mastro volas elŝiri sin por la tria fojo el la hejmo kaj repreni la profesion de la, por ili, misvaganta kavalirismo. Ili ĉiel klopodis apartigi lin de tiel abomeninda projekto, sed ilia penado egalas al tio, prediki en la dezerto aŭ marteli sur fridan feron. Ĉi-rilate, kaj inter multaj aliaj argumentoj, la mastrumantino diris al li:

—Vere, sinjoro, se via moŝto ne tenas la piedojn senmovaj, sidas trankvile en via hejmo kaj rezignas vagadi sur montoj kaj valoj kiel turmentata animo, serĉante kion laŭdire oni nomas aventuroj, kaj mi misfortunoj, mi plendos ĉe Dio kaj ĉe la reĝo, por ke ili vin retenu.

—Mastrino, mi ne scias kion respondos Dio al viaj plendoj, kaj ankaŭ ne kion respondos la reĝo; mi scias nur, ke, se mi reĝus, mi rifuzus respondi la egan nombron da impertinentaj peticioj ricevataj de li ĉiutage, ĉar unu el la plej pezaj ŝarĝoj, inter la multaj, kiujn la reĝoj elportas, konsistas en tio, ke ili sin devigas aŭskulti kaj respondi ĉian personon. Do, mi ne volus ĝeni lin ankaŭ per miaj aferoj.

—Diru, sinjoro, ĉu en la kortego ne vivas kavaliroj? — demandis tiam la mastrumantino.

—Jes, multaj —respondis don Quijote—. Kaj tiel devas esti, por ornamo de la grandeco de la suverenoj kaj de la pompo de la reĝa majesto.

—Kial via moŝto ne servas la reĝon, vian sinjoron, en la kortego mem, sen vagadi? —demandis la mastrumantino.

—Aŭskultu, amikino —respondis don Quijote—. Ne ĉiuj kavaliroj povas esti korteganoj, nek ĉiuj korteganoj povas, aŭ devas, esti vagantaj kavaliroj: en la mondo devas ekzisti ĉio. Kvankam ni ĉiuj estas kavaliroj, unuj tre diferencas de la aliaj, ĉar la kortegaj ne movas sin el siaj ĉambroj nek ekster la sojlo de la kortego kaj vojaĝas tra la tuta mondo nur per rigardado al la mapoj, sen elspezi eĉ unu soldon, kaj sen suferi varmon aŭ fridon, soifon aŭ malsaton. Sed ni, la veraj vagantaj kavaliroj, tage kaj nokte, piede kaj rajde mezuras la tutan teron per niaj propraj piedoj, submetate al la rigoroj de la suno, de la frido kaj de la libera ĉielo. Ni konas niajn malamikojn, ne nur el portretoj, sed en iliaj veraj personoj, kaj ĉiariske kaj ĉiaokaze atakas ilin sen zorgi pri tiaj bagateloj, kiel la leĝoj de la duelo, nome, ĉu ies lanco aŭ glavo estas pli malpli longa, ĉu la antagonisto portas sur si relikvojn aŭ kaŝitan armon, ĉu la pozicio de la suno favoras unu aŭ la alian... kaj pri ceteraj ĉi-specaj ceremonioj observataj en la dueloj inter persono kaj persono, kaj kies detalojn mi konas, sed ne vi. Sciu ankaŭ, ke bona vaganta kavaliro, eĉ se li renkontas dek gigantojn, kies kapoj ne nur tuŝas la nubojn, sed eĉ superas ilin per sia alteco; kies kruroj similas al turoj enormaj, kaj la brakoj al mastoj de plej potencaj ŝipoj, dum la okuloj grandas kiel muel-radoj kaj flamas kiel forno de vitrofaristo, nu, li sentas nenian teruron; male, kun brava teniĝo kaj aŭdaca koro alimpetas kaj atakas ilin kaj, se eble, ilin venkas kaj dispelas en nur momento, eĉ se ili sin ŝirmas per kirasoj el iaj fiŝaj ŝeloj laŭdire pli duraj ol diamantoj, kaj eĉ se ili svingas, anstataŭ glavo, akran cimitaron el superbe hardita ŝtalo aŭ feran klabon garnitan

per ŝtalaj dornoj, kion mi jam vidis plurfoje. Ĉion ĉi mi diras, mia bona mastrino, ke vi vidu la diferencon inter unuj kaj aliaj kavaliroj: sekve, estus juste, ke la suverenoj preferu ĉi duan, aŭ pli bone dirite, ĉi unuan specon de kavaliroj, ĉar, laŭ la historioj, ekzistis inter ili tiaj prodoj, ke ili savis, ne nur unu regnon, sed multajn.

—Ve sinjoro! —diris tiam la nevino—. Memoru via moŝto, ke, kion vi rakontas pri la vagantaj kavaliroj, tio konsistas el fabeloj kaj fikcioj indaj, se ne pereis en la flamoj de fajro, porti almenaŭ markon aŭ signon kiel avertilon, ke temas pri verkoj fiaj kaj koruptaj kontraŭ la sanaj moroj.

—Je Dio! —diris don Quijote—. Se vi ne estus mia nevino laŭ rekta linio, la filino de mia fratino, mi tiel punus vin pro via blasfemado, ke tra la tuta mondo resonus mia faro. Ĉu eblas, ke knabino kiel vi, kiu apenaŭ scias manipuli la dekduon da puntofaraj bastonetoj, kuraĝas kritiki kaj insulti la historiojn pri vagantaj kavaliroj? Kion dirus sinjoro Amadís, se li tion aŭskultus? Certe li pardonus vin, ĉar en sia epoko li distingiĝis kiel plej humila kaj ĝentila kavaliro de la mondo, kaj krome kiel granda protektanto de puceloj. Sed povus aŭskulti vin ankaŭ aliaj, kies reago farus al vi nenian bonon, ĉar ne ĉiuj montriĝas ĝentilaj kaj moderaj (kelkaj arogantas kaj insolentas) nek ĉiuj sin titolantaj kavaliroj meritas tian nomon: unuj estas el pura oro, aliaj el tombako. Ĉiuj ŝajnas kavaliroj, sed parto el ili ne povas elteni la provon de tuŝŝtono. Ekzistas homoj de basa rango, kiuj pufiĝas ĝiskreve en sia deziro ŝajnigi sin kavaliroj: kaj kavaliroj de supera nobeleco, kiuj sentas ian nerezisteblan impulson degradi sin. La unuaj leviĝas per la ambicio aŭ per la virto, la duaj falas pro la pigro aŭ pro la diboĉo. Sekve oni bezonas ekstreman klarvidon por distingi inter ĉi du specoj de kavaliroj, similaj laŭ la nomo, sed tute diferencaj laŭ la agoj.

—Je Dio! —diris la nevino—. Via moŝto tiel kleras, sinjoro onklo, ke en okazo de bezono vi povus paroli de kirka katedro aŭ prediki sur la stratoj; tamen vi kondutas tiel blinde kaj absurde, ke vi nomas vin kuraĝa, estante olda; fortika, estante malsana; korektanto de arbitroj, estante kaduka; kaj, precipe, kavaliro, kvankam vi ne havas tian rangon, atingeblan de nobeloj, sed ne de senhavaj homoj.

—Vi pravas, nevino —respondis don Quijote— kaj, rilate al la genealogioj mi povus diri al vi ion, kio surprizus vin: sed mi ne traktos ĉi aferon por ne miksi sakralon kun profano. Sciu, amikinoj, ke la tuta mondo apartenas al kvar geneologiaj branĉoj: al la unua, la familioj de humila origino, kiuj levis sin kaj kreskis ĝis supera grandeco; al la dua, la familioj grandaj en ties origino, kiuj daŭre konservas sian saman dimension moŝtan; al la tria, la familioj de nobela deveno, kiuj iom por iom reduktiĝas kaj finiĝas per nenio, kiel piramido, kies pinto, kompare kun la bazo aŭ fundamento, egalas al nulo; al la kvara, la familioj sen bona origino kaj sen respektinda disvolviĝo: ili finiĝas anonime, kiel la popolo pleba kaj ordinara. El la familioj ascenditaj de humila origino al nuna grandeco, servu kiel ekzemplo la domo otomana, kies kreo ŝuldiĝas al humila kaj basa paŝtisto, kaj kies apogeo ni povas vidi nun. El la duaj familioj, naskitaj en moŝteco konservata laŭlonge de la jaroj en la sama origina stato, ni povas mencii la ekzemplon de multaj heredaj suverenoj, kies digno teniĝas sen pliiĝo nek etiĝo, ĉar ili pace enfermas sin inter la limoj de siaj regnoj. El la triaj familioj, laŭorigine grandaj, sed kun pinta fino, troviĝas miloj da ekzemploj: la Faraonoj kaj Ptolomeoj de Egiptujo, la Cezaroj de Romo, kun la tuta bando, se tiel diri, de nekalkuleblaj monarĥoj, suverenoj kaj senjoroj medaj, siriaj, persaj, grekaj kaj barbaraj, finiĝis per pinto kaj nenio, same kiel iliaj prauloj: ĉar neeblas nun renkonti ajnan idon ilian, kaj, se jes, li troviĝus en basa kaj humila stato. Pri la pleba branĉo geneologia, mi diru nur, ke ĝi taŭgas ekskluzive por

kreskigi la nombron de la vivantoj, kaj ke ĝiaj faroj meritas nenian laŭdon aŭ disfamigon. El ĉio ĉi ĵus dirita, mi deziras, miaj karaj stultulinetoj, ke vi komprenu, kiel profundas la konfuzo ekzistanta inter la diversaj genealogioj, kaj ke nur la familioj virtaj, riĉaj kaj grandanimaj meritas la nomon de eminentaj kaj noblaj. Mi diras virtaj, riĉaj kaj grandanimaj, ĉar homo granda kaj samtempe diboĉa egalas al granda diboĉulo, kaj la riĉa kaj samtempe avara, al mizera almozulo: feliĉigas, ne posedi riĉojn, sed ilin elspezi bone, ne kaprice. La kavaliro senmona havas nur la virton por pruvi sian kavalirecon, montrante sin, ne fiera, aroganta aŭ klaĉema, sed afabla, bone edukita, ĝentila, servopreta kaj, precipe, almoz-dona, ĉar se li bonkore enmanigas al mizerulo eĉ nur du maravedojn, li montriĝas tiel donacema kiel la persono, kiu donas almozon kun laŭta distrumpetado. Se oni vidas kavaliron dotitan per tiaj virtoj, oni juĝas lin bonfamilia, eĉ se oni lin ne konas; kaj mirinde, se ne okazus tiel, se konsideri, ke oni ĉiam premias la virton per laŭdoj, kaj la virtaj homoj ne povas ne esti laŭdataj. Sur du vojoj, karaj miaj, oni povas alveni al la riĉo kaj al la honoro: sur la vojo de la letroj kaj sur la vojo de la armoj. Mi havas pli da armoj ol da letroj, kaj naskiĝis, pro mia inklino al la armoj, sub la influo de la planedo Marso; sekve mi estas preskaŭ devigita sekvi tian vojon, kaj ĝin plu sekvos spite la eventualan oponon de la tuta mondo. Vanas do, ke vi ĝislace klopodas persvadi min alfronti la volon de la ĉielo, la dekreton de la fortune, la postulon de la racio kaj, precipe, mian propran deziron. Mi scias, ke, kvankam nekalkuleblas la rigoroj propraj al la vaganta kavalirismo, per ĝi oni atingas infiniton da bonoj; mi scias ankaŭ, ke la pado de la virto stretas, ke la vojo de la diboĉo vidiĝas larĝa kaj vasta, kaj ke iliaj finaj celoj tre diferencas: la vojo larĝa kaj vasta de la diboĉo kondukas al la morto, kaj la pado streta kaj kruta de la virto, al la vivo, sed ne al la vivo efemera, sed al la vivo sen fino, kiel diris nia granda poeto kastilia:^[240]

Sur ĉi padeto kruta oni penas
atingi altan tronon de senmorto,
al kiu deviantoj ne alvenas.

—Ve, ho ve! —ekkriis la nevino—. Mia sinjoro estas ankaŭ
poeto! Ĉion li scias, ĉion li kapablas fari. Mi vetus, ke, se li
laborus masoniste, li konstruus domon tiel facile kiel kaĝon.

—Mi asertas al vi, nevino —respondis don Quijote—, ke, se la
pensoj pri kavaliraĵoj ne absorbus min tute, ĉion senescepte
mi scius fari, kaj miaj manoj kapablus konstrui ion ajn,
precipe kaĝojn kaj dentopikilojn.

Ĝuste tiam aŭdiĝis frapoj sur la pordo. Don Quijote
demandis, kiu do frapas, Sancho Panza respondis, ke li mem;
la mastrumantino, tuj kiam ŝi rekonis lian voĉon, kuris kaŝi
sin por ne vidi lin: tiel multe ŝi lin abomenis. La nevino
apertis al li la pordon, lia mastro don Quijote aliris akcepti lin
kun apertaj brakoj, ambaŭ enfermis sin en lia ĉambro, kie ili
tenis alian konversacion, tiel bonan kiel la antaŭa.

[240] Garcilaso de la Vega (1503-1536). La versoj apartenas
al lia *Elegio pro la morto de don Bernardino de Toledo*.

Ĉapitro 7

Pri la konversacio de don Quijote kaj lia ŝildisto, kune kun aliaj memorindaj eventoj

Apenaŭ la mastrumantino vidis, ke Sancho Panza enfermis sin kun sia mastro, ŝi divenis la objekton de lia vizito. Pensante, ke el ilia konversacio rezultus la decido entrepreni la trian eliron, ŝi prenis sian mantelon kaj, plena de aflikto kaj angoro, iris viziti la bakalaŭron Sansón Carrasco; ŝi imagis, ke pro sia facila parolo kaj freŝa amikeco kun ŝia mastro li povus persvadi la hidalgon, ke li rezignu sian absurdan ideon. La bakalaŭro promenadis en sia korto, kaj kiam la virino vidis lin, ŝi tuj genuiĝis antaŭ li, ŝvitante en sia konsterno. Ĉe ŝia elmonstro de doloro kaj perturbo, li demandis:

—Kio okazas, mastrino? Kio alvenis al vi, ke vi aspektas, kvazaŭ vi elspirus vian animon?

—Okazas, sinjoro Sansón, ke mia mastro sin elŝiros, denove sin elŝiros.

—Kiel li sin elŝiros? —demandis la bakalaŭro—. Ĉu li pensas elŝiri sin el ia parto de sia korpo?

—Ne tiel, sed tra la pordo de sia frenezo —ŝi respondis—. Mi volas diri, kara sinjoro bakalaŭro, ke li intencas elŝiri sin el sia hejmo, jam por la tria fojo, por serĉi tra la mondo kion li nomas venturoj;^[241] kvankam mi ne bone komprenas, kial li donas al ili tian nomon: la unuan fojon oni alportis lin transverse kuŝanta sur azeno kaj kun la korpo disbatita; la duan fojon li alvenis en bovoĉaro, enfermita en kaĝo, kie li imagis sin sub ensorĉo, kaj la kompatinda tiel statis, skeleta,

flava, kun la okuloj profunde en la kavoj ĝis preskaŭ la fundo de la kranio, ke eĉ la patrino lin naskinta ne povus koni lin. Pli ol ses cent ovojn kostis al mi iom refortigi lin, kion scias Dio, la tuta mondo, kaj same miaj kokinoj, kiuj povus diri, ĉu mi mensogas...

—Mi plene kredas vin —diris la bakalaŭro—. Viaj kokinoj estas tiel bonaj, grasaj kaj bone edukitaj, ke ili dirus nenion falsan, eĉ se ili krevus. Sed, sinjorino mastrino, ĉu vere ne temas pri alia misfortuno, aŭ okazas nur, ke vi timas kion don Quijote volas fari?

—Ne, sinjoro, mi ne timas ion pli mavan.

—Nu, ne faru al vi zorgojn —diris la bakalaŭro—. Reiru hejmen kun trankvila koro kaj tenu preta por mi varman manĝon. Kaj survoje recitu la preĝon de Sankta Apolonia, se vi konas ĝin, kaj vi miros je ĝia efiko. Mi tuj iros al vi.

—Ve kaj ve! —ekkriis la mastrumantino—. Ĉu via moŝto volas, ke mi recitu la preĝon de Sankta Apolonia? Tio konvenus, se al mia mastro dolorus la dentoj, sed fakte li suferas je la kapo.

—Faru kion mi diras, mastrino. Foriru kaj ne komencu diskuti kun mi. Vi bone scias, ke mi bakalaŭriĝis en Salamanca, kaj ke ne ekzistas pli supera bakalaŭreco ol la tiea.

Ĉe tio la mastrumantino foriris, la bakalaŭro iris al la pastro kaj interkonsentis kun li kion oni rakontos siatempe. Dume don Quijote kaj Sancho, enferminte sin en la ĉambro, tenis konversacion, kiun la historio registris plej fidele kaj ekzakte.

—Sinjoro —diris Sancho al sia mastro— mi jam persadis mian edzinon, ke ŝi lasu min akompani vin, kien ajn vi volos.

—«Persvadis» vi diru, ne «persadis» —korektis don Quijote.

—Se mi bone memoras —respondis Sancho— mi petis vian moŝton unu du fojojn, ke vi ne korektu miajn vortojn, se vi komprenas ilin; kaj se vi ne komprenas, ke vi diru: «Sancho, aŭ diablo, mi ne komprenas vin». Tiam se mi ne povus fari pli bonan klarigon, vi devus korekti min, ĉar mi estas sedema...

—Mi ne komprenas vin —tuj interrompis don Quijote—. Mi ne scias kion signifas «sedema».

—«Sedema» signifas, ke mi estas tia tiel...

—Nun mi komprenas vin eĉ malpli —diris don Quijote.

—Se vi do ne povas kompreni, mi ne scias jam kiel diri... Dio min helpu.

—Ha jes, mi divenas nun! Vi volas diri, ke vi estas tiel cedema, mola kaj fleksebla, ke vi konsentos kion ajn mi diros al vi, kaj agos laŭ miaj instrukcioj —klarigis don Quijote.

—Mi vetus, ke jam dekomence vi kaptis la signifon de la vorto; tamen, vi volis konfuzi min, por ke mi diru du cent novajn absurdojn.

—Eble... Sed kion diris Teresa? —demandis don Quijote.

—Teresa diris —respondis Sancho—, ke mi devas teni min garde kontraŭ vi, ke parolu skriboj kaj silentu lipoj, ke tranĉanto de ludkartoj ne disdonas ilin, kaj ke unu donaco valoras pli ol du promesoj. Kaj mi aldonas, ke konsilo virina ne valoras multe, sed, kiu ĝin ne aŭskultas, kondutas stulte.

—Ankaŭ mi opinias la samon —diris don Quijote—. Sed daŭrigu, Sancho, daŭrigu. Hodiaŭ vi parolas per oraj vortoj.

—Kiel via moŝto scias pli bone ol mi, la afero estas, ke ni ĉiuj fine falas en la morton, ke hodiaŭ ni ekzistas kaj morgaŭ ne, ke tiel same forpasas la ŝafido kiel la ŝafo, kaj ke neniu devas determini al si vivon pli longan en ĉi mondo, ol la vivo, kiun Dio disponis por li: ĉar la morto surdas kaj, frapante sur la pordo de nia vivo, rapidas ĉiam, kaj nek preĝoj, nek baroj, nek sceptroj nek mitroj kapablas ĝin deteni, kiel la tuta mondo scias, kaj kiel la predikistoj proklamas en la kirkoj.

—Vi pravas, sed mi ne komprenas kion vi celas —diris don Quijote.

—Mi celas —respondis Sancho—, ke via moŝto asignu al mi fiksan salajron monan pagendan ĉiumonate: ĉar ne plaĉas al mi dependi de favoroj, tial, ke ili alvenas tarde, mise aŭ neniam. Kio estas mia, al mi apartenas, kaj Dio min helpu. Resume, mi volas scii kiom mi ricevos, ĉu grandan, ĉu etan kvanton; la kokinoj demetas unu ovon post alia, multaj unuoj faras unu multon, kaj, se oni iom ricevas, neniom oni perdas. Cetere, se fine okazus (kion mi ne kredas nek esperas), ke via moŝto transdonus al mi la promesitan insulon, mi ne estas sendanka kaj avara ĝis la ekstremo rifuzi, ke oni deprenu de mia salajro mian katon el la rento eltirebla el la insulo.

—Amiko Sancho —diris don Quijote— kelkfoje la kato valoras tiel multe kiel la rato.^[242]

—Mi vin komprenas. Mi vetus, ke mi devis diri, ne katon, sed raton; tamen ne gravas: via moŝto bone kaptis la sencon.

—Tiel bone —diris don Quijote—, ke mi penetris ĝis viaj plej sekretaj pensoj kaj scias kion vi celas per la nekalkuleblaj sagoj de viaj proverboj. Nu, Sancho, mi volonte asignus salajron al vi se en ajna historio kavalira troveblus eĉ la plej

eta indico, ke la ŝildistoj ricevis pagon monate aŭ jare; sed mi legis la tutan, aŭ preskaŭ la tutan, kolekton de la libroj pri vagantaj kavaliroj kaj nenie trovis, ke ajna prodo asignis fiksan salajron al sia ŝildisto. Mi scias nur, ke la ŝildistoj servis senpage, kaj ke, en la plej neatendita momento, ili vidis sin rekompencitaj per insulo, aŭ per io ekvivalenta, aŭ almenaŭ ricevis moŝtan titolon, se la sorto montriĝis favora al iliaj mastroj. Se kun tiaj espero kaj eventualaj kompensoj vi deziras denove servi min, estu bonvena. Sed pensi, ke mi elsvingos el ties ĉarniroj kaj embrazuroj la oldajn regulojn kavalirajn, kaj ilin renversos, estas pensi neeblon. Reiru do hejmen, kara Sancho, kaj komuniku mian intencon al Teresa; kaj se ŝi konsentas, kaj al vi plaĉas servi min senpage, *bene quidem*;^[243] se ne, amikoj kiel antaŭe: ĉar, kiam ne mankas greno en la kolombejo, ankaŭ kolomboj ne mankas. Kaj memoru, amiko, ke bona espero valoras pli ol mizera havo, kaj bona pretendo pli ol mava pago. Mi tiel parolas, Sancho, por ke vi vidu, ke ankaŭ mi, kiel vi, povas inundi per pluvego da proverboj. Fine mi diras kaj ripetas, ke, se vi ne volas veni kun mi senkondiĉe nek submeti vin al la sama sorto kiel mi, akompanu vin Dio kaj faru el vi sanktulon; al mi ne mankos ŝildistoj pli obeaj kaj pli komplezaj ol vi, kaj ne tiel stultaj kaj parolemaj.

Kiam Sancho vidis la firman deciditecon de sia mastro, nigriĝis lia ĉielo kaj defalis la flugiloj de lia koro, ĉar li antaŭe opiniis, ke lia sinjoro ne forirus sen li eĉ por la tuta oro de la mondo. Li teniĝis konfuzita kaj enpena, kaj ĝuste tiam eniris Sansón Carrasco. Lin sekvis la nevino kaj la mastrumantino, puŝataj de la deziro aŭskulti, kian argumenton uzos la bakalaŭro por persvadi ilian sinjoron, ke li ne foriru denove serĉi aventurojn. Sansón, la granda ŝerculo, proksimiĝis al don Quijote, brakumis lin, kiel en la unua fojo, kaj diris emfaze:

—Ho floro de la vaganta kavalirismo! Ho brilega lumo de la armoj! Ho spegulo kaj honoro de la hispana regno! Volu la ĉiopova Dio nune kaj poste, ke se ia persono, aŭ personoj, intencas meti obstaklon aŭ baron al via tria eliro, li mem ne povu trovi la eliron el la labirinto de siaj deziroj nek iam plenumi sian plej karan projekton!

Poste, turnante sin al la mastrumantino, li aldonis:

—Vi povas ne plu reciti la preĝon de Sankta Apolonia, ĉar mi scias, ke la astroj speciale decidis, ke sinjoro don Quijote denove iru plenumi siajn noblajn kaj novajn ideojn; kaj mia konscienco min riproĉus, se mi ne instigus kaj persvadus ĉi kavaliron ĉesi retenigi kaj submeti la forton de sia kuraĝa brako kaj la aŭdacon de sia animo, ĉar pro lia prokrasto endanĝeriĝas la riparo de arbitroj, la honoro de puceloj, la protekto al orfoj, la defendo al vidvinoj kaj la helpo al edzinoj, aparte de aliaj aferoj de la sama speco propraj, koncernaj kaj rilataj al la ordeno de la vaganta kavalirismo. Tiel do, bela kaj brava sinjoro don Quijote, via granda kaj alta moŝto devas ekiri jam sur la vojo, prefere nun ol morgaŭ; kaj se io mankas al vi por la plenumo de via decido, jen mi, preta meti je via dispono mian personon kaj mian havon. Kaj se vi, plej supera moŝto, bezonus ŝildiston, mi konsiderus min ege feliĉa, servante vin en tia karaktero.

Ĉe tio don Quijote turnis sin al Sancho kaj diris:

—Ĉu mi ne avertis vin, Sancho, ke mi fine disponus abundon da ŝildistoj? Rigardu, kiu proponas sin!: la eksterordinara bakalaŭro Sansón Carrasco, konstante bonhumora, amuzanto de studentoj en la fakultataj kortoj de Salamanca, persone sana, membre facilmova, silenta, eltenema kontraŭ la frido kaj la varmo, kontraŭ la malsato kaj la soifo kaj posedanta ĉion necesan por esti ŝildisto de vaganta kavaliro. Sed la ĉielo ne permesu, ke, por obei mian kapricon, mi

renversu ĉi kolonon de la letroj, rompu ĉi vazon de scioj kaj dehaku ĉi superan palmobranĉon de la noblaj kaj liberalaj artoj! La nova Sansón restu en sia lando kaj, honorante ĝin, honoru en la sama tempo la grizajn harojn de siaj oldaj gepatroj: mi kontentiĝos per la unua ŝildisto sin propononta, konsiderante, ke Sancho ne degnas veni kun mi.

—Jes, mi degnas —respondis Sancho, kortuŝita kaj kun la okuloj plenaj de larmoj—. Oni ne diru pri mi, sinjoro mastro, ke «finiĝis la pano, adiaŭ, kompano». Ne, mi ne devenas de familio el sendankuloj: la tuta mondo scias, precipe mia vilaĝo, kiaj estis miaj antaŭuloj, la Panzas, kaj krome mi scias, pro la multaj bonaj faroj kaj pro la vortoj, eĉ pli bonaj, de via moŝto, ke vi deziras favori min. Se mi tro insistis rilate la kiomon kaj la kvanton de mia salajro, tion mi faris nur por komplezi mian edzinon, ĉar, kiam ŝi decidis ion, nenia maleo enbatas la ringojn de barelo tiel forte, kiel mia edzino, kiam ŝi enbatas, ke oni faru ŝian volon. Sed, verdire, viro devas vire kondukti, kaj virino virine; kaj ĉar mi estas viro ie ajn (kio ne negeblas) mi volas esti viro ankaŭ en mia domo, spite al ĉiu kaj al ĉio. Do, nenio plia restas por fari: nur, ke via moŝto skribu vian testamenton kaj aldonan kodicilon, ke oni ne povu ĝin reveki, kaj tuj poste ni ekiru sur la vojo, por ke ne plu suferu la animo de sinjoro Sansón, se konsideri, ke li diras, ke lia konscienco diktas al li persvadi vian moŝton vagadi por la tria fojo tra la mondo. Kaj denove mi proponas min por servi fidele kaj laŭleĝe vian moŝton, tiel bone kiel la ŝildistoj de ajna epoko nuna aŭ pasea servis al la vagantaj kavaliroj, kaj eĉ pli bone ol ili.

La bakalaŭro miris je la stilo kaj la vortoj de Sancho, ĉar, kvankam li legis la unuan parton de la historio de lia mastro, li tute ne kredis la ŝildiston tiel amuza, kiel oni lin pentris en la libro; sed nun, kiam li aŭdis lin diri «testamenton kaj aldonan kodicilon, ke oni ne povu ĝin reveki» anstataŭ «testamenton kaj aldonan kodicilon, ke oni ne povu ĝin

revoki», li kredis ĉion, kion li legis pri la ŝildisto, konsideris lin unu el la plej grandiozaj stultuloj de nia epoko, kaj pensis, ke tia paro da frenezuloj, kiel la mastro kaj la servisto, neniam antaŭe ekzistis en la mondo.

Fine don Quijote kaj Sancho brakumis unu la alian, reamikiĝis, kaj aŭskultinte la opinion kaj la aprobon de la granda Carrasco, ilia orakolo tiama, decidis entrepreni la vojaĝon post tri tagoj; dume ili devus provizi sin per ĉio necesa por la foriro, precipe per kompleta helmo, ĉar don Quijote insistis, ke li nepre devas porti ĝin. Sansón proponis al li unu tian, ĉar li sciis, ke amiko lia havas ĝin kaj volonte ĝin cedus, se konsideri, ke ĝi, tute manka je la brilo de polurita ŝtalo, nigris kaŭze de rusto kaj ŝimo.

Ne havis finon la malbenoj ĵetitaj de la nevino kaj la mastrumantino kontraŭ Carrasco; la du disŝiris siajn harojn, gratis sian vizaĝon kaj, laŭ la maniero de la iamaj ploristinoj, vekriis la foriron de la mastro kvazaŭ lian propran morton. Nu, Sansón, persvadante la hidalgon denove vojaĝi, komencis ludi rolon, kiun ĉi historio traktos siatempe, kaj kiun li prenis sur sin interkonsente kun la pastro kaj la barbiro.

Resume, en la diritaj tri tagoj don Quijote kaj Sancho havigis al si kion ili opiniis necesa, kaj post ol Sancho pacigis la edzinon, kaj don Quijote la nevinon kaj la mastrumantinon, ambaŭ, nerimarkate, ekiris ĉe la falo de la nokto, kaj la bakalaŭro akompanis ilin unu du mejlojn ekde la vilaĝo survoje al El Toboso. Don Quijote rajdis sur la bona Rocinante, kaj Sancho sidis sur la olda azeno kun la dusako bone provizita per viktualio, kaj la burso per mono, kiun don Quijote antaŭe konfidis al li por ajna eventualo. Sansón brakumis la kavaliron kaj petis lin, ke li ne forgesu informi lin pri siaj novaĵoj bonaj aŭ mavaĵaj, ke li povu aŭ ĝoji aŭ tristi, kiel postulas la leĝoj de la amikeco. don Quijote promesis

tion fari, Sansón reprenis la vojon al sia vilaĝo, kaj la paro iris plu ale al la granda urbo El Toboso.

[241] Neologismo el la hispana «ventura», kiu povas signifi, interalie, «aventuro» kaj «feliĉo». La mastrumantino uzas «ventura» laŭ ties dua senco.

[242] Vortoludo en la hispana, komprenebla, kiam oni scias, ke «rata» (rato) signifas ankaŭ, interalie, «pago aŭ disdivido proporcia».

[243] Latine: «tre bone».

Ĉapitro 8

Pri tio, kio okazis al don Quijote kiam li iris survoje por viziti sian sinjorinon Dulcinea de El Toboso

Benata estu la ĉiopova Allah, diras Hamete Benengeli ĉe la komenco de ĉi oka ĉapitro. Benata estu Allah, li ripetas trifoje, kaj deklaras, ke li tiel benas, ĉar li vidas, ke don Quijote kaj Sancho iras jam sur la vojo, kaj ke la legantoj de ilia plaĉa historio povas esti certaj, ke de ĉi momento komenciĝas la grandaj faroj kaj la spritaĵoj de don Quijote kaj ties ŝildisto. Krome li petas la legantojn forgesi la pasintajn kavaliraĵojn de la inĝenia hidalgo, kaj fiksi la okulojn al liaj futuraj aventuroj, kiuj komenciĝas de nun sur la vojo al El Toboso, kiel la aliaj komenciĝis sur la kampoj de Montiel. Kaj li petas ne multe, se konsideri, ke li promesas multon. Tiel do, li daŭrigas jene:

Don Quijote kaj Sancho trovis sin solaj kaj, apenaŭ Carrasco foriris, Rocinante komencis heni kaj la azeno iai, kion la hidalgo kaj la ŝildisto opiniis bona signo kaj tre favora aŭguro; sed, se diri la veron, pli multis la iaoj kaj suspiroj de la azeno ol la henoj de la ĉevalo, kaj el tio Sancho konjektis, ke lia bona sorto superus la sorton de lia mastro; mi ne scias, ĉu lia konjekto baziĝis sur ia speciala astrologio de li konata, ĉar la historio donas ĉi-rilate nenian klarigon: nur, ke, kiam li stumblis aŭ falis, oni aŭdis lin diri, ke li tre ĝojus, se li ne estus forlasinta sian hejmon, ĉar el la stumbloj kaj faloj nenion li gajnis krom ŝiritaj ŝuoj aŭ rompitaĵoj; kaj, kvankam stulta, Sancho havis pri ĉi punkto sufiĉe prudentan opinion.

—Sancho amiko —diris don Quijote—, la nokto jam falas rapide kaj obskuriĝas pli baldaŭ ol ni bezonus por alveni ankoraŭ kun la lumo de la tago al El Toboso, kien mi decidis iri antaŭ ol entrepreni alian aventuron. Tie mi ricevos la benon kaj la permeson de la senegala Dulcinea, kun kies permeso mi kredas, ke mi certe metos feliĉan finon al ĉia danĝera aventuro, ĉar nenio donas pli da kuraĝo al la vagantaj kavaliroj en ĉi vivo ol la scio, ke iliaj damoj ilin favoras.

—Mi opinias same —respondis Sancho— sed mi kredas, ke ne estos facile al via moŝto paroli al ŝi aŭ renkontiĝi kun ŝi en ia loko, kie ŝi povus doni al vi sian benon, escepte se ŝi benus vin de la muro de la kralo, kie mi vidis ŝin por la unua fojo, kiam mi transdonis al ŝi la leteron kun sciigoj pri la absurdoj kaj ekstravagancoj tiam plenumataj de via moŝto en la fundo de Sierra Morena.

—Ĉu ili ŝajnis al vi muroj de kralo, kiam vi admiris de ili ŝian neniam sufiĉe laŭdatan belon kaj gracion? Certe temis pri galerioj, koridoroj aŭ arkadoj, aŭ kiel ajn ili nomiĝas, de riĉaj kaj reĝaj palacoj.

—Eble —respondis Sancho—. Sed ili ŝajnis al mi muroj de kralo, se mi bone memoras.

—Nu, kio ajn ili estas, ni iru tien, Sancho —diris don Quijote—. Ĉar, se mi nur vidos ŝin super muro, tra fenestro, krado de ĝardeno aŭ fendo de pordo, la brilego de ŝia belo, trafante min en la okulojn, lumigos mian spiriton kaj fortigos mian koron, tiele, ke mi akiros unikan saĝon kaj senegalan kuraĝon.

—Nu, sinjoro, se diri la veron —respondis Sancho—, kiam mi vidis tian sunon, sinjorinon Dulcinea de El Toboso, ĝi ne brilis ĝis la ekstremo disĵeti de si radiojn; eble tial, ke, kiel mi diris

al vi, ŝia sinjorina moŝto okupis sin kribrante tritikon, kaj la abunda polvo deskuata de la greno pendis kiel nubo antaŭ ŝia vizaĝo kaj obskurigis ĝin.

—Nu, Sancho —diris don Quijote—. Kial vi insistas pensi, kredi kaj aserti, ke mia sinjorino Dulcinea kribris tritikon, se konsideri, ke tia tasko kaj funkcio ne havas ian rilaton kun la komunaj okupoj de la moŝtuloj, kies personoj estas formitaj kaj rezervitaj por aliaj taskoj kaj distroj, kiuj montras, je la distanco de sagoĵeto, ilian altan rangon? Certe, ho Sancho!, vi ne bone memoras la versojn de nia poeto,^[244] kie li pentras la laboron plenumitan de kvar nimfoj, en ties kristala loĝejo, kiam levinte la kapon el sia amata rivero Tajo, ili sidiĝis sur la verda herbo por teksti riĉan ŝtofon, interplektante oron, perlojn kaj silkajn fadenojn, laŭ la priskribo de la inĝenia poeto. Kaj certe en tio konsistis la laboro de mia sinjorino, kiam vi vidis ŝin, sed okazas, ke ia malica sorĉisto sendube sentas envion kontraŭ miaj aferoj, kaj ŝanĝas kaj turnas ĉion kapablan doni al mi plezuron, en formojn diferencajn de la aŭtentaj: tial mi timas, ke se la aŭtoro de la historio de miaj aventuroj, laŭdire jam presita, estas hazarde unu el miaj malamikoj sorĉistoj, certe li ŝanĝis unu aferon en alian, miksante mil mensogojn kun unu vero, kaj devianta de la sinsekvo propra al vera historio per enmeto de aferoj ekstertemaj. Ho envio, radiko de nekalkuleblaj malbonoj, vermo ronĝanta la meriton! Ĉiuj pekoj, Sancho, kunportas ian plezuron; sed la envio portas kun si nur ĉagrenon, rankoron kaj koleron.

—Ankaŭ mi opinias same —respondis Sancho—, kaj pensas, ke en la historio aŭ legendo, kiun, laŭ siaj diroj, Carrasco legis pri ni, sendube oni alkraĉas kaj trenas sur la koto nian reputacion, kvankam mi ĵuras, kiel honesta homo, ke mi neniam parolis malbonon kontraŭ ajna sorĉisto, nek posedas sufiĉan havon por vekti ies envion. Verdire, mi estas iom maliceta kaj iel inklinas friponi: sed ĉion ĉi kovras kaj kaŝas

la granda mantelo de mia simpleco ĉiam natura kaj neniaokaze artifika. Krome, la historiistoj devus min indulgi kaj trakti min bone en siaj verkoj, eĉ se nur pro tio, ke mi ĉiam vere kaj firme kredas je Dio kaj je la doktrino de la Sankta Eklezio Katolika, kaj sentas ĝismortan abomenon kontraŭ la judoj. Tamen, oni diru pri mi laŭplaĉe: mi naskiĝis nuda, kaj nuda mi estas, do nek perdas nek gajnas; ĉies opinioj gravas al mi tiel malmulte kiel figo, se mi aperas en libroj irantaj tra la mondo de mano en manon.

—Tio, Sancho —respondis don Quijote— igas min memori pri io okazinta al fama poeto ĉi-tempa; li verkis mordan satiron kontraŭ ĉiuj damoj libermoraj, sed ne inkluzivigis la nomon de damo, ĉar li ne certis, ĉu ankaŭ ŝi meretricis; rimarkinte, ke ŝi ne aperas en la listo, ŝi plendis al la aŭtoro, demandante kion li vidis ĉe ŝi, ke li ne enmetis ŝin en la liston de la aliaj, kaj petante, ke li plilongigu la satiron, ke ŝi havu lokon en ĝi: se ne, li endanĝerigus sian propran vivon. La poeto faris laŭ ŝia deziro, verkis pri ŝi malican priskribon, indan je la klaĉema lango de la duendoj, kaj ŝi kontentiĝis, vidante sin misfame fama. Ĉi-rilate menciindas ankaŭ la historio pri la paŝtisto, kiu forbruligis la faman templon de Diana, unu el la sep mirindaĵoj de la mondo, nur por ke lia nomo plu vivu en la futuraj tempoj; kaj, kvankam oni dekretis, ke oni ne menciui lin parole aŭ skribe, por ke lia ambicio ne plenumiĝu, tamen oni scias ankoraŭ, ke li nomiĝis Herostrato. Alian taŭĝan ekzemplon montras la historio pri la granda imperiestro Karolo la 5-a kaj kavaliro en Romo: la imperiestro deziris viziti la faman templon La Rotondo, nomatan La Panteono en la antikvaj tempoj, kaj nun konatan sub la pli ĝusta nomo de Kirko de Ĉiuj Sanktuloj. Ĝi estas la plej kompleta el la monumentoj konstruitaj kaj postlasitaj de la paganismo en Romo, kaj rivelas, pli ol la ceteraj, la amon de siaj fondintoj al la pompo kaj la grandiozo. Laŭforme ĝi similas al duona oranĝo impone granda, kaj ĝia interno tre klaras, kvankam la lumo

penetras nur tra fenestro, aŭ pli ĝuste, tra ronda lanterno sur la supro. La imperiestro rigardadis la konstruon kaj, apud li, Roma kavaliro montris al li la belajn kaj rafinojn de tia ĉefverko arkitektura. Poste, kiam ili distanciĝis de la lanterno, la kavaliro diris al la imperiestro:

»—Mil fojojn, plej respektinda majesta moŝto, mi sentis la deziron ĉirkaŭpreni vin kaj ĵeti min de la lanterno, por lasi en la mondo memoron eternan de mia nomo.

»—Mi dankas vin, ke vi ne efektivigis tiel mavan ideon — respondis la imperiestro—, kaj de nun mi ne donos al vi novan okazon pruvi al mi vian lojalon; tiel do, mi ordonas vin neniam paroli al mi, aŭ aperi antaŭ mia vido.

»Kaj, parolinte tiel, la imperiestro konsentis al li grandan favoron. Mi volas diri, Sancho, ke tre fortas la deziro akiri famon. Kio, se ne, puŝis Horacion de sur la ponto en la profundon de Tiberio? Kio bruligis la brakon kaj la manon de Mucio? Kio instigis Curcion ĵeti sin en la fajran abismon apertiĝintan meze de Romo? Kio, spite al ĉiaj omenoj kontraŭaj, igis Cezaron transiri Rubikonon? Kaj laŭ ekzemploj pli modernaj, kio sinkigis la ŝipojn kaj postlasis grupon da kuraĝaj hispanoj, komandataj de la eminenta Cortés, izolita sur la strandoj de la Nova Mondo? Ĉi faroj, kune kun aliaj same admirindaj, estis, estas kaj estos rezulto de la amo al la gloro, ĉar la homoj deziras gajni ĝin per heroaĵoj kiel premion kaj parton de sia eterneco. Tamen ni, kristanoj katolikaj kaj kavaliroj vagantaj, devas aspiri pli forte la gloron senmortan de la regionoj ĉielaj kaj eteraj, ol la vanton de la renomo akirita de ĉi nuna vivo efemera, kiu renomo, kiom ajn ĝi daŭros, finiĝos mem kun ĉi mondo destinita al pereco; tiel do, ho Sancho!, niaj agoj devas ne transpaŝi la limon markitan de la kristana religio, al kiu ni apartenas. Ni devas mortigi la orgojlon de la gigantoj per modero; la envion per grandanimeco kaj bonvolo; la koleron

per sinrego kaj per trankvilo de la animo; la manĝavidon kaj la dormemon per sobro kaj daŭra vekiteco; la lascivon kaj la karnan apetiton per la fidelo ŝuldata al la damoj, mastrinoj de niaj koroj; kaj la pigron per vagado tra la tuta mondo, serĉante la okazojn kapablajn igi nin, kristanojn, famaj kavaliroj. Per tio, Sancho, oni devas akiri la grandan laŭdon propran al la bona famo.

—Mi bone komprenas kion via moŝto diris ĝis nun — respondis Sancho—. Tamen mi dezirus, ke via moŝto sorbu al mi dubon, kiu ĉi-momente venas al mi en la memoron.

—«Solvu» vi volis diri, Sancho —korektis don Quijote—. Parolu, kaj mi respondos laŭpove.

—Diru al mi, sinjoro —daŭrigis Sancho—. Kie troviĝas nuntempe la Julioj, aŭ Aŭgustoj, kaj la ceteraj famaj kavaliroj jam mortintaj, kies nomojn vi menciis?

—La paganoj, certe en la infero —respondis don Quijote—. La kristanoj, se ili kondukis kristane, aŭ en la purgatorio, aŭ en la paradizo.

—Tre bone —diris Sancho—. Sed mi volus scii nun, ĉu la tomboj, kie kuŝas la kadavroj de tiaj sinjoregoj, havas ĉe la antaŭo lampojn el arĝento, aŭ ĉu la muroj de iliaj kapeloj aperas garnitaj per lam-bastonoj, mortotukoj, hararoj, kruroj kaj okuloj el vakso. Kaj se ne, per tio?

—La tomboj de la paganoj estis plej ofte pompaj monumentoj: la cindron de Julio Cezaro oni lokis sur la supron de ŝtona piramido de kolosa granda, hodiaŭ nomata en Romo Nadlo de Sankta Petro;^[245] la tombo de la imperiestro Hadriano konsistis el kastelo tiel granda kiel grava vilaĝo: ĝin oni nomis *moles Adriani* kaj nun kastelo de Sankta Anĝelo, en Romo; la reĝino Artemisa sepultis sian

edzon Maŭsoleo en tombon tiel grandiozan, ke oni taksis ĝin unu el la sep mirindaĵoj de la mondo; sed eĉ ne unu el tiaj tomboj, nek la multaj aliaj konstruitaj de la paganoj estis garnitaj per mortotukoj aŭ per la ceteraj oferdonoj kaj signoj rivelantaj la ĉeeston de sepultita sanktulo.

—Mi alvenas al la punkto celita! —diris Sancho—. Nun bonvolu respondi: kio pli grandas, revivigi mortinton aŭ mortigi giganton?

—La respondo evidentas: pli grandas revivigi mortinton.

—Mi vin kaptis nun! —daŭrigis Sancho—. Tiel do, kiu redonas la vivon al mortinta, la vidon al blinda, la forton al malsana kaj la normalan iron al lama, kaj havas ĉe la antaŭo de sia tombo lampojn lumajn, dum liaj kapeloj plenas de piaj homoj adorantaj surgenue liajn relikvojn, ĝuos pli bonan famon en ĉi vivo kaj en la transa, ol la paganaj imperiestroj kaj la vagantaj kavaliroj de ajna epoko.

—Ankaŭ pri tio mi konsentas —respondis don Quijote.

—Nu, bone —aldonis Sancho—. La kadavroj kaj la relikvoj de la sanktuloj posedas ĉi famon, ĉi favoron, ĉi prerogativon, aŭ kiel ajn oni ĝin nomas, kaj kun la aprobo kaj la permeso de nia Sankta Patrino la Eklezio ili ricevas nombron da lampoj, kandeloj, mortotukoj, lam-bastonoj, pentraĵoj, hararoj, okuloj kaj kruroj, el kio rezultas pliiĝo de la popola devoteco kaj disvastiĝo de ilia kristana famo. La reĝoj mem portas surŝultre la kadavrojn de la sanktuloj aŭ ties relikvojn, kisas pecojn de iliaj ostoj, ornamas kaj riĉigas per ili siajn preĝoĉambrojn kaj siajn plej karajn altarojn.

—Kian konkludon mi devas eltiri el viaj vortoj, Sancho? —demandis don Quijote.

—Mi volas diri —respondis la ŝildisto—, ke, se ni fariĝus sanktuloj, ni akirus pli rapide la bonan famon, kiun ni aspiras. Memoru via moŝto, ke hieraŭ aŭ antaŭhieraŭ (temas pri tempo tiel proksima al ni, ke ni povas uzi tian dirmanieron) oni kanonizis aŭ beatuligis paron da senŝuaj monaĥetoj,^[246] kaj jam la homoj konsideras grandan feliĉon tuŝi kaj kisi la feran ĉenon, per kiu ili zonis kaj torturis sian korpon, kaj kiun oni kultas pli ol la glavon de Rolando en la arsenalo de nia sinjoro la reĝo, kies vivon Dio gardu. Tiel do, kara mastro, esti humila monaĥo de ajna ordeno valoras pli ol vagadi kuraĝe kaj kavalire; du dekduoj da skurĝobatoj agrablas al Dio pli ol du mil lancopikoj kontraŭ gigantoj, monstroj kaj drakoj.

—Vi pravas —respondis don Quijote—, sed ni ĉiuj ne povas esti monaĥoj, kaj Dio kondukas siajn elektitojn sur diversaj kaj multaj vojoj al la ĉielo. La kavalirismo estas religio, kaj en la paradizo sidas kavaliroj sanktuloj.

—Jes —diris Sancho—, sed mi aŭdis, ke en la ĉielo la monaĥoj multas pli ol la vagantaj kavaliroj.

—Ĉar la nombro de la monaĥoj grandas pli ol la nombro de la kavaliroj.

—Multaj estas la vagantaj —respondis Sancho.

—Multaj. Sed nur kelkaj meritas la nomon de kavaliro.

Per ĉi konversacio kaj aliaj similaj ili pasigis la nokton kaj la sekvantan tagon, sen ke io menciinda okazus al ili, ĉe la granda ĉagreno de don Quijote. Fine, unu tagon poste, ĉe la falo de la nokto, ili distingis la grandan urbon El Toboso, ĉe kies apero ĝojis la spirito de don Quijote, kaj tristis Sancho, ĉar li nek konis la domon de Dulcinea, nek iam en sia vivo vidis ĝin, same kiel lia mastro. Tiel do, la unua, ĉar li deziris

vidi ŝin, kaj la alia, ĉar li neniam ŝin vidis, sentis grandan agitiĝon en si, kaj Sancho ne kapablis imagi kion li devus fari, se lia mastro sendus lin al El Toboso.

Fine don Quijote decidis, ke ili enirus en la urbon jam en la profundo de la nokto, kaj, atendante ĉi momenton, ili restis inter kelkaj kverkoj proksime al El Toboso; kaj en la dirita horo ili eniris en la urbon, kie okazis al ili okazindaj oferoj.

[244] Garcilaso de la Vega (1503-1536); la versoj aluditaj apartenas al lia 3-a *Eklogo*.

[245] Temas pri la obelisko 25,50 m longa, kiun, laŭ ordono de Kaligulo, oni transportis de Egiptujo kaj starigis en la Cirko de Nerono. En 1586 oni translokis la obeliskon, laŭ ordono de papo Siksto la 5-a, al la placo Sankta Petro. Ne tute veras la aserto de don Quijote pri la cindro de Julio Cezaro.

[246] Eble Sankta Diego de Alcalá, mortinta en 1463 kaj kanonizita en 1588, kaj Sankta Petro de Alcántara, mortinta en 1562.

Ĉapitro 9

Kie oni rakontas kion ĝi entenas

Proksimume ĉe la noktomezo don Quijote kaj Sancho eliris el la kverkaro kaj eniris en El Toboso. Profunda silento regis en la vilaĝo, ĉar ĝiaj enloĝantoj dormis kvazaŭ marmotoj, kiel oni kutime diras. La nokto iom helis, kvankam Sancho preferus ĝin tute senluma, por ke, dank' al la tenebro, lia mensogo ne elmontriĝu. En la vilaĝo aŭdiĝis nur hundaj bojoj, surdigaj en la oreloj de don Quijote kaj alarmaj en la koro de Sancho. De tempo al tempo iais azeno, gruntis porkoj, miaŭis katoj, kaj iliaj diversaj blekoj ŝajnis pli laŭtaj en la silento de la nokto. La enamiĝinta kavaliro konsideris ĉion ĉi mava aŭguro, tamen li diris al Sancho:

—Sancho, mia filo, gvidu min al la palaco de Dulcinea: eble ni trovos ŝin ankoraŭ vekita.

—Al kia palaco mi devus gvidi, je Dio? —demandis Sancho —. Mi vidis ŝian altan moŝton nur en tre eta domo.

—Do, eble ŝi troviĝis tiam en aparta pavilono de sia alkazaro amuzante sin kun siaj ĉambristinoj, laŭ kutimo de moŝtaj damoj kaj princinoj.

—Sinjoro —diris Sancho—. Eĉ se via moŝto volas, spite al mi, ke la domo de sinjorino Dulcinea estu alkazaro, ĉu vi kredas, ke ĉi-hore ni trovus ŝian pordon aperta? Ĉu konvenus al ni voke frapadi, kaŭzante ĉies alarmon kaj konfuzon, ĝis ili aŭdus kaj apertus al ni? Ĉu eble ni estas amaĝistoj, kiuj iras al siaj konkubinoj kaj arogas al si la rajton frapi la pordon kaj eniri en la domon en ajna horo, eĉ en la plej tarda?

—Unue, ni iru de domo al domo, ĝis ni trovos la alkazon — respondis don Quijote—, kaj poste mi diros al vi kion fari. Sed rigardu, Sancho: aŭ mi apenaŭ vidas, aŭ la vasta maso da ombro distingebla de ĉi tie estas la palaco de Dulcinea.

—Se tiel, via moŝto gvidu —petis Sancho—. Eble vi pravas, sed eĉ se mi vidus ĝin per miaj okuloj kaj ĝin tuŝus per miaj manoj, mi kredus ĝin palaco, tiel multe kiel mi kredas, ke la suno brilas ĉi-momente.

Don Quijote do gvidis, iris proksimume ducent paŝojn, alvenis al la ombra maso, vidis altan turon kaj komprenis, ke tie staras, ne alkazo, sed la ĉefa kirko de la vilaĝo.

—La kirko nin frontas, Sancho —diris la hidalgo.

—Tion mi vidas —respondis la ŝildisto—, kaj Dio volu, ke ni ne renkontu ĉi tie nian tombon,^[247] ĉar ne estas bona signo vagi ĉe tombejo ĉi-hore. Krome, se mi bone memoras, mi jam diris al via moŝto, ke la domo de la sinjorino devas stari en senelira strato.

—La diablo vin prenu, idioto! —diris don Quijote—. De kie vi kaptis la ideon, ke la alkazaroj kaj reĝaj palacoj staras en sak-stratoj?

—Ĉiu lando havas sian propran kutimon, sinjoro —respondis Sancho—. Eble oni kutimas ĉi tie, en El Toboso, konstrui en stratetoj la palacojn kaj la grandajn domojn; tiel do, mi petas vian moŝton, ke vi permesu min serĉi en ĉi stratoj kaj stratetoj: eble mi povus renkonti en ajna angulo vian damnindan alkazon, kiun mi vidu manĝita de hundoj, se konsideri, kiom longa kaj teda irado ĝi kostas al ni.

—Parolu kun respekto pri la aferoj de mia sinjorino, Sancho —admonis don Quijote—. Regu inter ni la paco, kaj ni ne forĵetu la ŝnuron, perdinte la sitelon!^[248]

—Mi retenos min —respondis Sancho—. Sed, kiel mi povus paciencelteni, se via moŝto ne trovas ĝin, se konsideri ke vi certe vizitis ĝin milojn da fojoj?

—Vi frenezigos min, Sancho —diris don Quijote—. Aŭskultu, diablo: ĉu mi ne diris al vi milfoje, ke en mia tuta vivo mi neniam vidis la senegalan Dulcinea, nek transiris la sojlon de ŝia palaco, kaj ke mi amas ŝin el onidiroj, pro la famo de ŝia belo kaj saĝo?

—Nur nun mi aŭdas tion de vi por la unua fojo —respondis Sancho—. Kaj sciu, ke, se via moŝto ne vidis ŝin, ankaŭ al mi okazis la samo.

—Neeble —diris don Quijote—. Kiam vi revenis kun ŝia respondo al mia letero, kiun vi antaŭe alportis al ŝi, vi diris al mi, almenaŭ, ke vi vidis ŝin kribri tritikon.

—Ne tro fidu tion, sinjoro —respondis Sancho—, ĉar mi sciigas vin, ke ankaŭ la intervidiĝo kun ŝi kaj la respondo estis el onidiroj; vere mi konas sinjorinon Dulcinea tiel bone, kiel bone mi povus frapi per pugno la ĉielon.

—Sancho, Sancho —diris don Quijote—, estas momentoj por ŝerci, kaj momentoj, kiam la ŝercoj tute ne konvenas, nek ŝajnas oportunaj. Se mi diras, ke mi nek vidis la sinjorinon de mia koro, nek parolis kun ŝi, tio ne signifas, ke vi devas diri la samon, se konsideri, ke okazis kontraŭe, kiel vi bone scias.

Tiel parolante ili vidis alproksimiĝi viron kun paro da muloj, kaj pro la bruado de lia plugilo, kiu treniĝis sur la tero, ili ĝuste pensis, ke li estas kampulo ellitiĝinta antaŭ la matenruĝo por iri plugi. La kampulo kantis dumire la romancon, kies teksto komenciĝas jene:

Kiel oni vin tradraŝis,
francoj, apud Roncesvalles!

—Oni min pendumu, Sancho —diris don Quijote, aŭdinte la kanton—, se io bona okazos al ni ĉi-nokte. Ĉu vi ne aŭskultas la kanton de tiu kampulo?

—Jes, mi aŭskultas —respondis Sancho—. Sed kion komunan havas la batalo de Roncesvalles kun nia serĉado? Eĉ se li kantus la romancon de Caláinos,^[249] estus tute same rilate al la bona aŭ mava fino de nia afero.

Ĉe tio la kampulo alvenis al ili, kaj don Quijote demandis al li:

—Ĉu vi povus diri al ni, mia bona amiko, kies vivon Dio favoru, ĉu troviĝas proksime la palacoj de la senegala princino doña Dulcinea de El Toboso?

—Sinjoro —respondis la agrulo—, mi ne estas de ĉi vilaĝo. Mi venis ĉi tien antaŭ nur kelkaj tagoj, kaj servas al riĉa kamparano, plugante lian teron. Sed tie, en la kontraŭa domo, loĝas la pastro kaj la sakristiano, kaj unu aŭ la alia, aŭ ambaŭ, povos informi vin pri la sinjorino princino, ĉar ili havas la liston de la loĝantoj de El Toboso. Tamen, mi kredas, ke en la tuta vilaĝo vivas nenia princino; multaj damoj, jes, eĉ moŝtaj, se konsideri, ke ĉiu el ili povas esti princino en sia hejmo.

—Nu, amiko —diris don Quijote—, inter ili certe troviĝas la damo, pri kies persono mi demandas vin.

—Eble vi pravas —respondis la agrulo—. Sed jam komencas tagiĝi, do adiaŭ.

Kaj, pelante la mulojn, li plu iris sen atendi novajn demandojn. Sancho vidis sian mastron perpleksa kaj

mishumora kaj diris:

—Sinjoro, tagiĝas rapide, kaj ne konvenus atendi ĝis la suno trafus nin en la strato; estus pli bone, se ni elirus el la urbo, kaj via moŝto kaŝus vin inter la veproj ĉi-proksime. Mi revenos tage kaj esploros ĝis la plej apartaj anguloj serĉante la domon, alkazon aŭ palacon de mia sinjorino, kaj tre mavan sorton mi havos, se mi ne trovos ĝin; ĝin trovinte, mi parolos kun ŝia sinjorino moŝto, kaj diros al ŝi, kie kaj kiel vi atendas ŝian ordonon kaj instrukcion, por ke vi povus vidi ŝin sen damaĝi ŝian honoron kaj reputacion.

—Sancho, per nur kelkaj vortoj vi esprimis la saĝon de mil proverboj —diris don Quijote—. Volontege mi aprobas kaj akceptas vian konsilon. Mia filo, ni iru do serĉi bonan kaŝejon por mi, kaj, kiel vi diris, vi revenos trovi, vidi kaj alparoli mian sinjorinon, de kies ĝentilo kaj saĝo mi esperas supermiraklajn favorojn.

Sancho brulis en sia deziro eltiri sian mastron el la vilaĝo, por ke don Quijote ne eltrovu, ke la ŝildisto elpensis la respondon, kiun li donis en Sierra Morena je la nomo de Dulcinea. Tiel do, li urĝis ekiri, kion ili tuj faris, kaj du mejlojn for, ili trovis bosketon, kie don Quijote sin kaŝis, dum Sancho Panza revenis al la urbo por paroli kun Dulcinea. Kaj en tia entrepreno okazis al li kelkaj aventuroj indaj je nova atento kaj nova kredito.

[247] La tombejoj ordinare situis apud la kirkoj.

[248] Proverba esprimo: ne ĉion fiaskigi aŭ detrui, se io antaŭe perdiĝis aŭ suferis difekton.

[[249](#)] Per tio oni aludis la argumentojn tedajn aŭ neoportunajn. Laŭ la romanco, la maŭro Caláinos devus forhaki la kapon al tri Paruloj de Francio.

Ĉapitro 10

Kie oni rakontas pri la ruzo, kiun Sancho uzis por ensorĉi sinjorinon Dulcinea, kaj pri iliaj aferoj tiel amuzaj kiel veraj

Konfesas la aŭtoro de ĉi granda historio, ke, kiam li komencis skribi ĉi ĉapitron, li deziris pasi super ĝi en silento, ĉar li timis, ke oni ne kredas lin, se konsideri, ke la frenezaĵoj de don Quijote atingis ĉi tie la plejan ekstremon aŭ gradon imageblan, kaj eĉ superis ĝin per la longo de du sagoĵetoj. Sed fine la aŭtoro, malgraŭ siaj timoj kaj hezitoj, skribis la farojn de nia hidalgo ĝuste kiel ili okazis, sen aldoni aŭ depreni eĉ unu atomon da vero, kaj sen zorgi, ke oni povus akuzi lin pri mensogo. Kaj li pravis, ĉar la vero, kvankam kelkfoje fragila, neniam rompiĝas kaj ĉiam flosas sur la mensogo, kiel oleo sur akvo. Tiel do, daŭrigante sian historion, la aŭtoro diras, ke tuj kiam don Quijote kaŝis sin en la veprejo, bosko aŭ kverkaro proksima al la granda El Toboso, li ordonis la ŝildiston reiri al la urbo kaj ne aperi denove antaŭ li, sen antaŭe diri al lia sinjorino, je lia nomo, ke ŝi bonvolu konsenti ian intervidiĝon kun sia kavaliro-sklavo, kaj ke ŝi degnu doni sian benon al li, por ke plenumiĝu sukcese liaj plej danĝeraj aventuroj kaj entreprenoj.

Sancho promesis fari kiel ordonite, kaj alporti tiel bonan respondon kiel en la unua fojo.

—Iru do, filo —respondis don Quijote—, kaj ne konfuziĝu, kiam vi vidos vin antaŭ la lumo de la suno de belo, kiun vi iras serĉi, ho vi, plej feliĉa inter la ŝildistoj de la mondo! Retenu en via memoro, kaj ne forgesu, la detalojn de via

akcepto ĉe ŝi: ĉu ŝia koloro ŝanĝiĝas, dum vi klarigas al ŝi vian mision; ĉu ŝi agitiĝas kaj perdas la aplombon, aŭskultante mian nomon; ĉu ŝi nervoze movetas sin sur la kusenoj, se okaze ŝi sidas en la riĉa *estrado* propra al ŝia rango, aŭ, se ŝi staras, observu, ĉu ŝi apogas sin unue sur unu piedo kaj poste sur alia; ĉu ŝian respondon ŝi ripetas al vi du tri fojojn; ĉu la tono de ŝia voĉo ŝanĝiĝas de milda en raspan, de acida en teneran; ĉu ŝi levas la manon al siaj haroj por ilin aranĝi, eĉ se ili estas en ordo; unuvorte, filo, observu ĉian movon kaj agon ŝian, kaj se vi priskribos ilin al mi ĝuste, kiel ili okazis, mi povos dedukti kion ŝi tenas kaŝita en la sekreta fundo de sia koro koncerne al la afero de mia amo. Ĉar vi devas scii, Sancho, se vi ne scias ankoraŭ, ke, inter geamantoj, la eksteraj movoj kaj agoj, per kiuj manifestiĝas iliaj kor-inklinoj, estas ege fidelaj kurieroj komunikantaj tion, kio vere okazas en la interno de la animo. Iru, amiko, vin gvidu sorto pli bona ol la mia, kaj revenu kun la feliĉo, kiun mi atendas inter la timo kaj la espero en ĉi amara soleco, kie vi min lasas.

—Mi iros kaj revenos baldaŭ —diris Sancho—. Dume, senpezigu vian povran koron kaj lasu ĝin kreski, ĉar certe vi nun havas ĝin tiel eta kiel nukso. Memoru, ke, laŭdire, kuraĝa koro venkas la mavan sorton, ke, kie ne ekzistas kolbasoj, mankas najlo por ilin pendigi, kaj ke la leporo elsaltas tie, kie oni tute ne atendas. Tion mi diras, ĉar, kvankam en la nokto ni ne trovis la palacojn aŭ alkazarojn de nia sinjorino, mi esperas nun, en la tago, renkonti ilin en la plej neatendita momento; kaj kiam mi trovos ŝin, permesu, ke mi sola traktu kun ŝi.

—Vere, Sancho —diris don Quijote—, viaj proverboj tiel aplikeblas al la temoj traktataj, ke mi volus, ke Dio donu al mi pli da lerto por la realigo de miaj deziroj, ol da ĝi vi havas por la elekto de viaj sentencoj.

Ĉe tiaj vortoj de don Quijote, Sancho turnis la dorson, instigis per vergo sian azenon, kaj don Quijote, side sur la ĉevalo, ripozante sur la piedingo kaj apogante sin al la lanco, restis plena de tristaj kaj konfuzaj pensoj, kaj tie ni lasas lin por sekvi lian ŝildiston, kiu disiĝis de sia mastro tiel enpena kaj konfuzita kiel li: tiel multe, ke apenaŭ li elrajdis el la bosko, turnis la kapon, kaj rimarkante, ke don Quijote perdiĝis el la vido, li sidiĝis ĉe la piedo de arbo, kaj komencis paroli al si mem:

—Nu, frato Sancho, ni sciu, kien via moŝto iras: ĉu vi iras serĉi ajnan azenon, kiun vi perdis? «Ne, certe ne». Kion do vi serĉas? «Mi serĉas, ne ion ajn, sed grandiozan princinon kaj, en ŝi, la sunon de la belo kaj la ceteran firmamenton». Kaj kie vi esperas trovi kion vi diras?. «Kie? En granda urbo El Toboso». Nu bone, je kies nomo vi iras serĉi ŝin?. «Je la nomo de la fama kavaliro don Quijote de La Mancha, kiu riparas arbitrojn, kaj donas akvon al soifantaj kaj manĝon al malsataj». Tre bone, Sancho, sed, ĉu vi konas la domon de la princino? «Diras mia mastro, ke ŝi devas loĝi en reĝaj palacoj aŭ en superbaj alkazaroj». Ĉu vi hazarde vidis ŝin iam? «Nek mi, nek mia mastro iam vidis ŝin». Kaj se la loĝantoj de El Toboso sciis, ke vi estas ĉi tie kun la intenco ŝteli de ili iliajn princinojn kaj perturbi la koron de iliaj damoj, ĉu vi opinias, ke ili agus juste kaj ĝuste, se ili tanus al vi la haŭton kaj vergus ĝispulvoro viajn ripojn kaj pistus ĉiun oston vian? «Vere ili pravus, se ili ne konsiderus, ke mi obeas ordonojn, kaj ke “estas mi nur kuriero, havas do nenian kulpon”».^[250] Ne fidu tion, Sancho: la manĉanoj estas tiel koleremaj kiel honestaj, kaj toleras nenies provokon. Je Dio, se ili havus eĉ etan suspekton pri vi, via sorto ne enviindus! «Ho ne, tute ne, al la diablo! Mi ne dediĉos min serĉi tri piedojn al la kato^[251] pro alies kaprico, des pli, ke serĉi Dulcinean en El Toboso egalus serĉi Marian en Raveno aŭ la bakalaŭron en

Salamanca.^[252] La diablo, jes, la diablo en persono puŝis min en ĉi aferon!».

Sancho tenis ĉi monologon kun si mem, el kio rezultis, ke li konkludis jene:

—Nu, bone, ĉio havas rimedon, escepte de la morto, sub kies jugo ni devas pasi vole nevole ĉe la fino de nia vivo. Mi vidas per mil signoj, ke mia mastro estas frenezulo enferminda, sed tial, ke mi sekvas kaj servas lin, mi mem kvazaŭ konkuras kun li kaj eĉ pli frenezas, laŭ la proverboj, «Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas», kaj, «Kun kiu vi festas, tia vi estas». Ĉar li do frenezas ĝis la ekstremo preni ofte unu aferon por alia, kaj opinias la blankon nigra kaj la nigran blanka, kio klare montriĝis, kiam li asertis, ke la ventomuelejoj estas gigantoj, kaj la muloj de la ekleziuloj dromedaroj, kaj la ŝafaroj armeoj malamikaj, krom multaj aliaj similaj ekzemploj, ŝajnas al mi, ke estus facile kredigi al li, ke ia kampulino, la unua aperonta sur la vojo, estas sinjorino Dulcinea, kaj, se li ne kredos min, mi ĵuros jese; kaj se li ĵuros nee, mi reĵuros jese, kaj se li insistos, mi insistos pli forte, tiele, ke mi ĉiam diros la lastan vorton, kio ajn okazos. Kaŭze de tio, eble li ne plu sendos min kun komisionoj kiel la nuna, vidante, ke mi alportas al li tre mavajn respondojn, aŭ eble li pensos, ke la perversa sorĉisto malamika al li (kiel li diras) ŝanĝis la figuron de Dulcinea por ĝeni kaj spiti lin.

Per tiaj pensoj Sancho trankviligis sian konsciencon kaj konsideris la aferon solvita. Li atendis tie ĝis la posttagmezo, por ke don Quijote kredu, ke li havis tempon por iri al kaj reveni de El Toboso. Kaj ĉio prosperis al li tiel bone, ke, kiam li stariĝis por salti sur la azenon, li vidis, ke el la direkto de El Toboso alproksimiĝas tri kampulinoj sur tri azenoj aŭ azeninoj (la aŭtoro ne klariĝas ĉi punkton: kredeble temis pri azeninoj, ordinaraj rajdbestoj de la vilaĝaj virinoj, sed,

ĉar la afero ne gravas, ni ne interrompos la historion por fari esploron ĉi-rilate). Nu, tuj kiam Sancho vidis la kampulinojn, li rajdis trote al sia mastro, kaj trovis lin suspiranta kaj diranta mil lamentojn amajn. Vidante lin, don Quijote demandis:

—Kion novan, amiko Sancho? Ĉu mi markos ĉi tagon per ŝtono blanka aŭ per nigra?^[253]

—Pli bone, se via moŝto markus ĝin per ruĝo, kiel surmuran tabuleton de profesoro,^[254] por ke oni ĝin bone vidu.

—Ĉu vi do alportas bonan novaĵon? —demandis don Quijote.

—Tiel bona, ke via moŝto devas nur sproni Rocinante, rajdi al la aperta kampo kaj renkontiĝi kun sinjorino Dulcinea de El Toboso, kiu venas kun du ĉambristinoj por viziti vian moŝton.

—Sankta Dio! Kion vi diras, frato Sancho? —respondis don Quijote.

—Atentu, ne trompu min, ne ĝojigu mian veran aflikton per falsaj esperoj.

—Kion mi profitus, trompante vian moŝton, precipe kiam vi povas facile eltrovi, ĉu mi diras la veron? Spronu, sinjoro, venu kaj vidu vian mastrinon la princinon en robo kaj garnoj propraj al ŝi. Ŝiaj ĉambristinoj kaj ŝi ŝajnas relumi kiel oro; sur ili ĉio vidiĝas spikoj da perloj, ĉio diamantoj, ĉio rubenoj, ĉio brokatoj el pli ol dek tavoloj;^[255] iliaj haroj kaskadas libere sur ilia dorso, kvazaŭ sunaj radioj ludantaj kun la vento kaj, plej rimarkinde, ili rajdas sur tri imponaj makulharaj pelofrenoj.

—«Palefrenoj» vi volis diri, Sancho —korektis don Quijote.

—Ne gravas la diferenco inter «pelofreno» kaj «palefreno» — respondis la ŝildisto—, sed kion ajn ili rajdas, ili aspektas kiel la plej elegantaj damoj imageblaj, precipe mia sinjorino, la princino Dulcinea, ĉe kies belo la sensoj raviĝas kaj kvazaŭ svenas.

—Ni iru, filo Sancho —urĝis don Quijote—, kaj, rekompence por ĉi novaĵo tiel neatendita kiel bona, mi promesas rezervi por vi la plej valoran predon el la unua aventuro, kiun mi entreprenos; sed, se vi preferas alion, mi donos al vi idojn ĉijare naskotajn de miaj tri ĉevalinoj: ĉar vi scias, ke ili jam gravedis, kiam mi lasis ilin en la komuna paŝtejo de nia vilaĝo.

—La idojn mi preferas —respondis Sancho—, ĉar mi ne tre certas, ke la predoj el la unua aventuro havos ian valoron.

Ĉe tio ili eliris el la bosko kaj distingis la tri kampulinojn jam proksime. Don Quijote ĵetis sian rigardon laŭlonge de la vojo de El Toboso, kaj, rimarkante nenion, krom la tri vilaĝaj virinoj, profunde perpleksis kaj demandis la ŝildiston, ĉu li lasis la damojn ekster la urbo.

—Kiel ekster la urbo? —respondis Sancho—. Ĉu eble via moŝto havas la okulojn en la nuko, ke vi ne vidas, ke ili venas al ni kaj brilas kiel la suno de la tagmezo?

—Mi vidas nur, Sancho, tri kampulinojn sur tri azenoj —diris don Quijote.

—Dio liberigu min de la diablo —respondis Sancho—. Ĉu eble la tri palefrenoj, aŭ kiel ajn ili nomiĝas, blankaj kiel neĝaj flokoj, ŝajnas azenoj al via moŝto? Je Dio, mi vidu min sen mia barbo, se tio verus.

—Tamen, mi ripetas, amiko Sancho, ke ili estas tiel veraj azenoj aŭ azeninoj, kiel vi estas Sancho Panza kaj mi don

Quijote; almenaŭ tian aspekton ili havas.

—Silentu, sinjoro, ne diru ion tian; frotu al vi la okulojn kaj iru fari omaĝon al la mastrino de viaj pensoj, kiu alproksimiĝas.

Tion dirinte, Sancho alrajdis renkonte al la tri virinoj, deseliĝis, prenis la bridon de unu el la azenoj de la kampulinoj, lasis sin fali sur ambaŭ genuoj kaj diris:

—Reĝino, princino kaj dukino de la beleco, via alta kaj granda moŝto degnu ricevi en vian simpatian kaj favoran vian kavaliron-sklavon, kiu plena de konfuzo kaj kun svena koro staras tie kvazaŭ marmora ŝtono, tial, ke li vidas sin antaŭ via superba persono. Mi estas Sancho Panza, la ŝildisto, kaj li, la ĉiame survoja kavaliro don Quijote de La Mancha, alnome la Kavaliro de la Trista Mieno.

Ĉe tio, ankaŭ don Quijote jam genuis apud Sancho kaj rigardis kun mir-rondaj okuloj kaj perpleksa esprimo la virinon, kiun Sancho nomis reĝino kaj moŝtulino; kaj tial, ke li vidis ĉe ŝi nur kampulinon, kaj krome ne belan, ĉar ŝi havis rondan vizaĝon kaj platan nazon, li sentis konsternon kaj admiron kaj ne kuraĝis aperti la buŝon. Ankaŭ la kampulinoj same plenis de miro, vidante, ke la du viroj, tiel diferencaj unu de la alia, teniĝas surgenu kaj ne permesas ilian kunulinon plu iri. Sed ĉi lasta rompita la silenton, kriante seke kaj kolere:

—Iru al la diablo kaj lasu min pasi! Ni havas urĝon!

—Ho princino kaj monde fama sinjorino de El Toboso! —diris tiam Sancho—. Kial via nobla koro ne moliĝas, vidante, ke antaŭ via sublima persono genuas la kolono kaj subteno de la vaganta kavalirismo?

Tion aŭdinte, unu el la du aliaj kampulinoj kriis:

—Jen, kiaj vortoj! Vidu, kiel la sinjoraĉoj venas nun moki kampulinojn, kvazaŭ ni ne scius same blagi kiel ili! Nu, iru vian vojon, lasu nin sekvi la nian, kaj fartu bone!

—Stariĝu, Sancho —diris tiam don Quijote—. Mi vidas, ke la destino, ankoraŭ ne laca fari al mi mavon, fermis ĉian vojon, por ke ĉi povra animo mia, inkrustita en la karno, ricevu el nenie ajnan konsolon. Kaj vi, ho pleja perfekto dezirebla, kulmino de la homa ĝentilo, ununura rimedo por ĉi afliktita koro vin adoranta! Nun, kiam la maligna sorĉisto, kiu min persekutas, kovris al mi la okulojn per nuboj kaj kataraktoj; kiam nur por mi, kaj ne por aliaj, li ŝanĝis kaj transformis vian senegalan belon kaj vizaĝon en la mienon de povra kampulino, mi vin petas (se li ne transformis ankaŭ min en ian monstron, por ke mi aperu abomeninda antaŭ viaj okuloj) ke vi degnu rigardi min mole kaj tenere kaj vidi, en mia surgenua submetiteco antaŭ via deformita belo, la humilon de mia koro vin kultanta!

—Diru tion al via avo! —respondis la kampulino—. Mi ne ŝatas tiajn komplementojn!^[256] Iru do flanken, lasu min pasi kaj ni dankos vin.

Sancho, ege kontenta, ke li tiel bele eltiris el sia embaraso, alflankiĝis kaj lasis ŝin iri. Vidante sin libera, la kampulino figurinta kiel Dulcinea instigis sian *pelofrenon* per pikilo fiksita ĉe la fino de vergo, kiun ŝi portis, kaj ek trotis sur la kampo antaŭen. Sed, kiam la azenino sentis la pikojn pli intensaj kaj oftaj ol ordinare, ĝi tiel komencis karakolaĉi, ke sinjorino Dulcinea falis teren. Ĉe tia akcidento don Quijote alkuris por helpi ŝin, kaj Sancho por ĝuste remeti kaj fiksi la ŝarĝo-selon, kiu surglitis ĝis sub la ventro de la azenino. Sed, kiam oni alĝustigis la selon, kaj don Quijote pretis levi inter siaj brakoj la ensorĉitan damon, la sinjorino, stariĝinte per si mem, ŝparis al li lian penon, ĉar ŝi retroiris kelke da paŝoj, faris kurtan kuron, metis la manojn sur la gropon de la

azenino, kaj, pli leĝere ol falko, impulsis sian korpon kaj trafis sur la selon kun la kruroj en forka maniero, laŭ la vira stilo.

—Je Dio —diris tiam Sancho—, nia mastrino pli leĝeras ol nizo kaj certe povus instrui la plej spertan rajdiston de Córdoba aŭ Meksikio salte surĉevaliĝi. Ŝi impulsis sin trans la postan selarkon per unu salto, kaj sen spronoj igas la palefrenon kuri rapide kiel zebro. Kaj ŝiaj ĉambristinoj apenaŭ iometon distancas je ŝi; ili ĉiuj kuras kiel la vento.

Li diris la veron, ĉar la aliaj kampulinoj, vidante Dulcinean denove sur la selo, forpafis sin post ŝin kaj ne turnis la kapon ĝis ili iris preskaŭ du mejlojn. Don Quijote sekvis ilin per la rigardo, kaj, kiam ili perdiĝis el la vido, li sin turnis al Sancho kaj diris:

—Sancho, ĉu vi vidas nun, kiel multe la sorĉistoj spitas min, kaj ĝis kia ekstremo iras ilia malico kaj rankoro, se konsideri, ke ili senigis min je la kontento vidi mian mastrinon en ties vera figuro? Vere, mi naskiĝis modelo de senfortunaj, kaj celo kaj objekto de la sagoj ĵetataj de la mava sorto. Rimarku ankaŭ, Sancho, ke ĉi kanajloj ne kontentiĝis per nur la metamorfozo de Dulcinea, sed ŝanĝis kaj transformis ŝin en plumpan kaj vulgaran kampulinon, kaj krome prenas de ŝi ion tre propran al la grandaj damoj, nome, ties agrablan bonodoron ŝuldatan al tio, ke ili ĉiam vivas inter floroj kaj ambroj. Ĉar mi sciigas vin, Sancho, ke, kiam mi proksimiĝis al Dulcinea por helpi ŝin suriri la palefrenon (kiel vi diras, kvankam ĝi ŝajnis al mi azenino), tiam trafis min odoraĉo je kruda ajlo, kiu skuis kaj venenis mian animon.

—Ho friponoj! —ekkriis Sancho—. Ho sorĉistoj malignaj kaj tord-intencaj! Kiam oni povos vidi vin surŝnurigitaj je la blankoj, kiel sardeloj sur junko? Multon vi scias, multon vi povas, kaj multan mavon vi faras. Kanajloj, ĉu ne sufiĉis al vi

ŝanĝi la perlojn de la okuloj de mia damo al gajloj de kverko, ŝian hararon el purega oro al krinoj de ruĝabova vosto, kaj laste, ŝian belan vizaĝon al senĉarma mieno? Ne, vi fuŝis ankaŭ ŝian parfumon kaj tiel evitis, ke, almenaŭ per ĝi, ni scius kio kaŝiĝis sub ŝia aspra krusto. Nu, se diri la veron, mi ĉiam vidis ĉe ŝi, ne ŝian plumpon, sed nur ŝian ĉarmon, kiun ĉe la supra lipo garnis kaj pliperfektigis belgrajno kiel mustaĉo,^[257] kun sep aŭ ok blondaj haroj similaj al oraj fadenoj pli ol unu spanon longaj.

—Laŭ la interrilato ekzistanta inter la belgrajnoj de la vizaĝo kaj de la korpo —respondis don Quijote—, Dulcinea certe havas alian belgrajnon sur la femuro de la sama flanko; sed la haroj de vi menciitaj ŝajnas al mi tro longaj por tiaj makuletoj.

—Tamen mi povas diri al via moŝto, ke ili estis tiaj kaj aspektis tre bele.

—Mi kredas vin, amiko —diris don Quijote—, ĉar la naturo donis al Dulcinea nenion, kio ne vidiĝus ĝisdetale perfekta; tiel, se ŝi havus centon da belgrajnoj similaj al la belgrajno de vi menciita, ili aspektus nur kiel lunoj kaj brilaj steloj. Sed diru, Sancho: ĉu estis plata selo aŭ flanka selo tio, kion vi fiksis kaj mi prenis por ŝarĝo-selo?

—Temis ĝuste pri sinjorina selo —respondis Sancho— kun tego tiel riĉa, ke ĝi valoras la duonon de regno.

—Kaj pensi, ke mi vidis nenion el tio, Sancho —kriis don Quijote—. Mi diras nun denove, kaj rediros milfoje, ke mi estas la homo plej senfortuna en la mondo!

Aŭskultante la stultaĵojn de sia tiel bele trompita mastro, la fripona Sancho apenaŭ povis retenigi la ridon. Fine, parolinte ankoraŭ longan tempon, ili surseliĝis kaj iris sur la vojo al

Zaragoza, kien ili pensis alveni en la ĝusta tempo por ĉeesti la solenan feston ĉiujare celebratan en tiel fama urbo. Sed antaŭ ol ili alvenus tien, okazis al ili multaj, gravaj kaj kuriozaj aventuroj, indaj esti skribitaj kaj legitaj, kiel oni vidos.

[250] Versoj el olda romano.

[251] Proverba esprimo: entrepreni ion, el kio povas rezulti mavaĵ konsekvencoj por la entreprenanto mem.

[252] Proverba esprimo ne uzata nuntempe: entrepreni malfacilan taskon.

[253] Kelkokaze la antikvaj Romanoj signis la tagojn feliĉajn per ŝtonetoj blankaj, kaj la missortajn aŭ fatalajn per nigraj.

[254] Ekzistis en la universitatoj la kutimo fiksi tiajn tabuletojn aŭ ŝildojn kun la nomo de la profesoro kaj kun indiko de la objekto de lia instruado.

[255] La plej riĉaj brokatoj konsistis nur el tri sinsekve supermetitaj tavoloj, do dektavolaj brokatoj ekzistis nur en la fantazio de Sancho.

[256] La kampulino volis diri «komplimentojn».

[257] Neologismo. Hispane «bigote», «mostacho»; angle «moustache»; france «moustache». Lipharoj.

Ĉapitro 11

Pri la stranga aventuro okazinta al la kuraĝa don Quijote kun la ĉaro de *La parlamento de la Morto*

Don Quijote iris sur la vojo antaŭen kaj profunde meditis pri tio, kiel malice mokis lin la sorĉistoj, kiam ili turnis lian sinjorinon Dulcinea en la plumpan figuron de kampulino; kaj tiamaniere liaj pensoj absorbis lin, ke, nekonscie, li lasis la bridon sur la kolon de Rocinante; la ĉevalo, sentante sin libera, haltis ĉiupaŝe por mordeti la verdan herbon abundan sur la tieaj kampoj. Sancho Panza eltiris lin el lia meditado, dirante:

—Sinjoro, la aflikto fariĝis ne por la bestoj, sed por la homoj; sed se la homoj spertas ĝin tro forte, ili ŝanĝiĝas al bestoj; via moŝto rekonsciiĝu, refirmigu vian spiriton, prenu la bridon de Rocinante, animiĝu kaj retrovu la bravan sintenon propran al vagantaj kavaliroj. Ĉu ni estas ĉi tie aŭ en Francujo?^[258] Nu, Satano prenu kun si ĉiun Dulcinea de ĉi mondo, ĉar valoras pli la bonfarto de unu sola vaganta kavaliro ol ĉiaj ensorĉoj kaj transformoj sur la tero!

—Silentu, Sancho! —respondis don Quijote kun pli da energio ol atendeble—. Silentu, mi diras, kaj ne blasfemu kontraŭ la ensorĉita damo, pri kies misfortuno kaj malfeliĉo nur mi kulpas. Kaŭze de tio, ke la perversaj min envias, ŝi suferas tian faton.

—La samon mi opinias —diris Sancho—. Kiu, vidinte ŝin, povus nun vidi ŝian aspekton sen plori?

—Vi povas tiel paroli, Sancho —respondis don Quijote—, ĉar vi admiris ŝin en la plena perfekteco de ŝia belo, tial, ke la

sorĉistoj ne iris ĝis la ekstremo perturbi vian vidon kaj kaŝi antaŭ vi ŝian ĉarmon. Ilia veneno efikas nur kontraŭ mi kaj kontraŭ miaj okuloj. Tamen, Sancho, pri io mi konscias nun: vi mispentris al mi ŝian belon, ĉar, se mi bone memoras, vi diris, ke ŝiaj okuloj ŝajnis perloj, kaj tiaj okuloj pli konformas al bramo ol al damo; mi kredas, ke la okuloj de Dulcinea devas esti grandaj smeraldoj verdaj, kun du ĉielarkoj anstataŭ brovoj. Bonvolu do, Sancho, preni la perlojn el ŝiaj okuloj kaj ilin transigi al ŝia buŝo, ĉar sendube vi konfuzis la dentojn kun la okuloj.

—Eble ŝia ĉarmo perturbis min tiel multe, kiel ŝia malbela vian moŝton —diris Sancho—. Sed ni ĉion lasu en la manoj de Dio: Li scias kio devas okazi en ĉi valo de la ploroj, en ĉi mava mondo, kie apenaŭ ekzistas io ne miksa kun perverso, mensogo kaj friponeco. Sed unu afero, kara mastro, zorgigas min pli ol la aliaj, nome, kio okazos, kiam via moŝto, venkinte ajnan giganton aŭ alian kavaliron, ordonos lin iri kaj sin prezenti antaŭ la bela Dulcinea; kie trovos ŝin la povra giganto aŭ la povra kaj mizera kavaliro venkita? En mia imago mi vidas lin vagadi tra El Toboso, gapante kiel stulta en sia klopodo renkonti mian sinjorinon Dulcinea; kaj eĉ se li renkontus ŝin meze de la strato, li ne konus ŝin pli ol mian propran patron.

—Eble, Sancho, la ensorĉo ne etendiĝos ĝis la ekstremo, ke al la venkitaj gigantoj kaj kavaliroj, kiuj sin prezentos al ŝi, mankos la povo koni ŝin: sed ni faros eksperimenton, sendante unu du el miaj unuaj venkotoj. Mi ordonos ilin reveni, ke ili raportu, ĉu ili vidis ŝin aŭ ne.

—Vere, sinjoro —diris Sancho—, via ideo ŝajnas al mi tre bona. Per ĉi artifiko ni eltrovos kion ni deziras scii; kaj se, efektive, ŝi aperas ŝanĝita nur antaŭ via moŝto, tia misfortuno pli pezos sur vin ol sur ŝin. Sed tiel longe kiel sinjorino Dulcinea ĝuos bonfarton kaj feliĉon, ni, de nia

flanko, aranĝos nin kiel eble plej bone, serĉante aventurojn, kaj lasante, ke la Tempo faru sian laboron, ĉar ĝi estas la plej bona kuracisto por ĉi malsanoj, kaj por aliaj eĉ pli gravaj.

Don Quijote volis respondi sian ŝildiston, sed de tio lin detenis la apero, sur la vojo, de ĉaro ŝarĝita per plej diversaj kaj strangaj personoj kaj figuroj imageblaj. Kiel ĉaristo kaj kondukanto de la muloj funkciis hida demono. La ĉaro vidiĝis aperta sub la ĉielo, t.e. sen kovro aŭ tegmento. La unua figuro aperinta antaŭ la okuloj de don Quijote estis la Morto mem kun homa vizaĝo; apud ĝi staris anĝelo kun grandaj flugiloj pentritaj; flanke troviĝis imperiestro kun krono, ŝajne ora, sur la kapo; ĉe la piedoj de la Morto sidis la dio nomata Cupido, sen bendo sur la okuloj, sed kun sia arko, sagoj kaj sagujo; tie troviĝis ankaŭ kavaliro en kompleta armaĵo, sed kun ĉapelo abunde garnita per plumoj el diversaj koloroj, anstataŭ helmo aŭ ŝtala kapopeco; krome vidiĝis aliaj personoj kun diversaj kostumoj kaj aspektoj.

Ĉi spektaklo, absolute neatendita, agitis la hidalgon kaj metis timon en la koron de Sancho; sed don Quijote, kredante ke ia nova kaj danĝera aventuro prezentiĝas al li, tuj ĝojis. Kun ĉi penso, kaj kun la spirito preta alfronti ajnan danĝeron, li metis sin antaŭ la ĉaro kaj diris laŭte kaj minace:

—Ĉaristo, koĉero aŭ diablo, tuj diru, kien vi iras, kaj kiuj estas vi kaj la aliaj homoj portataj en la ĉaro, pli simila al la barko de Karono ol al ĉaro ordinara.

Ĉe tio, la diablo ĝentile respondis, deteninte la veturilon:

—Sinjoro, ni estas aktoroj de la kompanio de Angulo el Malo; ĉi matene ni ludis, okaze de la oktavo de Pasko, en vilaĝo sidanta trans la tiea monteto, la pecon *La parlamento de la Morto*, kaj ĉi-vespere ni reludos ĝin en la vilaĝo videbla tie

for: kaj tial, ke ambaŭ lokoj tre proksimas inter si, ni iras en niaj aktoraj kostumoj por ŝpari al ni la ĝenon demeti kaj tuj denove surmeti ilin. La junulo tie figuras la Morton; la alia, anĝelon; tiu virino, edzino de la aŭtoro, faras la rolon de reĝino; la alia viro, la rolon de soldato; la alia estas la imperiestro; kaj mi, la diablo, t.e. unu el la ĉefaj roluloj de la peco, ĉar en ĉi kompanio mi ludas la ĉefajn personojn. Se via moŝto deziras koni ion plian pri ni, demandu min. Mi respondos kontentige, ĉar, kiel diablo, mi ĉion scias.

—Mi ĵuras je mia fido de vaganta kavaliro —respondis don Quijote—, ke, kiam mi vidis vian ĉaron, mi tuj imagis, ke ajna granda aventuro prezentiĝas al mi; kaj nun mi diras, ke, por ne fali en trompiĝon, necesas tuŝi per la mano la ŝajnon. Iru kun Dio, bonuloj, ludu vian pecon, kaj se mi povus iel utili al vi, sciu, ke mi volonte kaj plezure farus al vi ajnan servon, ĉar de miaj infanaj jaroj mi amas la teatron kaj, kiam knabo, sentis veran pasion por la sceno.

Kiam ili tiel babilis, kaj kvazaŭ la fato tion volus, unu aktoro en arlekena kostumo kun multaj tintiletoj proksimiĝis al don Quijote, kaj, svingante vergon, de kies ekstremo pendis tri plenblovitaj vezikoj bovaj, kaj frapante la teron per ili, komencis kaprioli, kio forte sonigis la tintiletojn; kaj ĉi aĉa vizio tiel multe teruris Rocinante, ke, sen ke don Quijote havus forton sufiĉan por bridi la ĉevalon, ĝi prenis la mordaĵon inter la dentoj kaj impetis tra la kampoj kun pli da rapido ol la ostoj de ĝia skeleto povus promesi. Sancho, vidante, ke lia mastro troviĝas en la danĝero fali teren, desaltis de la azeno kaj rapidis helpi lin; sed, kiam la ŝildisto atingis lin, li jam kuŝis sur la grundo, same kiel la ĉevalo, falinta kun sia mastro: ordinara fino kaj rezulto de la momentoj de ardo kaj kuraĝo de Rocinante.

Sed apenaŭ Sancho lasis sian rajdbeston por iri helpi don Quijote, la dancanta diablo saltis sur la azenon kaj instigis

ĝin per la vezikoj. La bruo kaj la timo, multe pli ol la doloro de la frapoj, igis la bruton flugi tra la kampoj ale al la vilaĝo, kie devus havi lokon la ludo. Sancho rigardis la kuron de sia azeno kaj la falon de sia mastro, kaj ne sciis pri kio zorgi unue; sed, ĉar li estis bona ŝildisto kaj servisto, la amo al lia mastro regis fine super lia korinklino al la azeno, eĉ se ĉiufoje kiam li vidis la vezikojn leviĝi en la aero kaj fali sur la gropon de lia besto, li sentis la agonion kaj la angoron de la morto, kaj preferus senti la frapojn sur siaj propraj okulgloboj ol vidi ilin fali eĉ sur la plej eta haro de la vosto de la azeno. En ĉi stato de perplekso kaj ĉagreno li alvenis al la loko, kie don Quijote kuŝis pli muelita ol li dezirus, helpis lin suriri la ĉevalon kaj diris:

—Sinjoro, la diablo prenis kun si la azenon.

—Kiu diablo? —demandis don Quijote.

—La diablo kun la vezikoj —respondis Sancho.

—Do, mi reprenos la azenon eĉ se la diablo enfermos sin kun ĝi en la plej profundaj kaj tenebraj ublietoj de la infero. Sekvu min, Sancho, la ĉaro lantas kaj per ĝiaj muloj mi kompensas al vi la perdon de via azeno.

—Ne necesas tio, sinjoro —respondis Sancho—. Via moŝto bridu vian koleron, ĉar ŝajnas al mi, ke la diablo lasis la azenon, kaj ĉi lasta jam venas al ni.

Efektive, la diablo, falinte de la azeno, imite al don Quijote kaj Rocinante, plu iris piede al la vilaĝo, dum la azeno revenis al sia mastro.

—Malgraŭe, konvenos repagi la insolenton de tiu diablo, punante ajnan personon de la ĉaro, eĉ la imperiestron, se necese —diris don Quijote.

—Elprenu tian penson el via kapo —respondis Sancho—. Prefere sekvu mian konsilon: neniam spitu al farsistoj, ĉar ilin protektas la favoro de la homoj. Mi vidis iam aktoron arestitan pro du murdoj, kaj oni lin liberigis nepunite, kaj sen ke li pagus iom. Via moŝto sciu, ke, ĉar ili estas uloj gajaj kaj amuzaj, ili ricevas ĉies helpon, protekton kaj estimon, des pli se la aktoroj apartenas al la reĝaj kompanioj kaj posedas leĝan licencon. Kaj ĉiuj, aŭ la pli granda parto, ŝajnas princoj pro siaj kostumoj kaj teniĝoj.

—Tamen la farsisto diablo kun siaj ŝercoj ne eskapos de mi eĉ se la tuta homa gento lin favoros.

Kaj tion dirinte, li reiris al la ĉaro, jam tre proksima al la vilaĝo kaj kriis laŭte:

—Haltu, atendu, bando de bufonoj kaj amuzistoj! Mi volas instrui vin, kiel oni devas trakti la azenojn kaj animalojn, kiuj servas kiel rajdbestoj al la vagantaj kavaliroj!

Tiel multe kaj laŭte kriis don Quijote, ke la homoj en la ĉaro aŭdis kaj komprenis lin; kaj juĝante la intencon de la hidalgo per ties vortoj, la Morto tuj elsaltis el la ĉaro kaj lin sekvis la imperiestro, la diablo kaj la anĝelo, plus la reĝino kaj la dio Cupido; ili ĉiuj ŝarĝis sin per ŝtonoj, aranĝis sin formante vicon kaj pretis bonvenigi la hidalgon per la pintoj de la ŝtonoj. Sed, vidante ilin en tiel kuraĝa plotono, kun la brakoj levitaj por alĵeti la ŝtonojn, don Quijote bridis la ĉevalon kaj komencis pensi kiel li povus ataki ilin, riskante kiel eble plej ete sian personon. Dum li tion pensis, Sancho alvenis al li, kaj rimarkante lin inkлина impeti kontraŭ la plotono aranĝita en batala formacio, diris:

—Egalus al granda frenezo, sinjoro, ĵeti sin en tian entreprenon. Via moŝto pensu, ke ne ekzistas en la mondo defenda armo kontraŭ hajlo da ŝtonaj kugloj, escepte se oni

sin kaŝas kaj enfermas sub bronza sonorilo. Kaj ankaŭ oni devas konsideri, ke estas pli temerara ol kuraĝa la viro kiu, sola, atakas armeon, kie troviĝas la Morto, kaj kie batalas imperiestroj en persono, helpataj de bonaj kaj mavaj anĝeloj. Kaj se tia konsidero ne persvadas vin resti trankvila, pensu, ke, inter la homoj tieaj, ekzistas nenia vaganta kavaliro, kvankam ili ŝajnas reĝoj, princoj kaj imperiestroj.

—Sancho, vi ĵus faris la rimarkon kapablan deturni min de mia decido —respondis don Quijote—. Kiel mi jam diris al vi multfoje, mi povus kaj devas elingi la glavon nur kontraŭ kavaliroj. Se vi volas, Sancho, al vi koncernas venĝi vin kontraŭ la ofendo farita al via azeno; kaj de ĉi tie mi helpus vin per miaj krioj kaj konsiloj.

—Ne ekzistas ia kaŭzo por venĝo, sinjoro —diris Sancho—, ĉar ne apartenas al bonaj kristanoj venĝi kontraŭ la ofendoj, des pli, ke mi faros, ke la azeno lasu sian ofenditecon en la manoj de mia volo, kiu deziras vivi pace la tempon al mi destinitan de la ĉielo.

—Ĉar tia estas via decido, bona Sancho, saĝa Sancho, kristana Sancho kaj sincera Sancho, ni ignoru ĉi fantomojn kaj reiru serĉi pli bonajn kaj solidajn aventurojn; ĉar ŝajnas, ke, en ĉi regiono, ne mankos al ni multaj kaj plej eksterordinaraj.

Tuj poste li turnis per la brido la ĉevalon. Sancho Panza iris preni sian azenon, kaj la Morto kun sia tuta deplojita plotono regrimpis en la ĉaron kaj daŭrigis sian vojaĝon. Kaj la timinda aventuro de la ĉaro de la Morto havis ĉi feliĉan finon dank' al la saĝaj konsiloj de Sancho Panza. Sed la sekvantan tagon don Quijote havis alian aventuron, ne malpli ekscitan ol la ĵus pasinta, kun unu enamiĝinta kaj vaganta kavaliro.

[[258](#)] Proverba esprimo arkaika; per ĝi oni aludis faron neoportunan aŭ konduton nedecan.

Ĉapitro 12

Pri la stranga aventuro okazinta al la kuraĝa don Quijote kun la brava kavaliro de la speguloj

Post la renkontiĝo kun la Morto, don Quijote kaj lia ŝildisto pasigis la nokton sub altaj kaj frondoriĉaj arboj, kie, ĉe la insistado de Sancho, la hidalgo manĝis iom de la provizoj portataj de la azeno. Kaj dum la manĝo Sancho diris al sia mastro:

—Kiel mi stultus, sinjoro, se mi estus elektinta la predon el via unua aventuro anstataŭ la idojn de viaj tri ĉevalinoj! Vere, pli valoras tuj ovo ol poste bovo.

—Tamen, Sancho —respondis don Quijote—, se vi lasintus min ataki, kiel mi volis, eble vi ricevus kiel predon almenaŭ la oran kronon de la imperiestro kaj la pentritajn flugilojn de Cupido, ĉar mi ilin perforte forprenus por meti ilin en viajn manojn.

—La kronoj kaj sceptroj de la imperiestroj aktoroj —diris Sancho— neniam estas el pura oro sed el straso kaj latuno.

—Efektive —respondis don Quijote—. Kaj ne konvenus, se la garnoj uzataj en la dramoj estus veraj, anstataŭ ŝajnaj kaj fikciaj, kiel la dramoj mem. Ĉi-rilate mi volas, Sancho, ke vi favore konsideru la teatron kaj sekve ties aktorojn kaj aŭtorojn, ĉar ili kontribuas fari grandan bonon al la regno, ĉiupaŝe prezentante al ni spegulon, kie reflektiĝas, kvazaŭ veraj, la agoj de la homa vivo: kaj nenia arto povas esprimi en pli reala maniero ol la dramoj kaj la aktoroj tion: kiaj ni estas, kaj kiaj ni devus esti. Nu, diru, ĉu iam vi ne spektis komedion, kie intervenas reĝoj, imperiestroj kaj pontifoj,

kavaliroj, damoj kaj aliaj diversaj personoj? Unu faras la rolon de fripono; alia, de mensogulo; alia, de komercisto; alia, de soldato; alia, de saĝa naivulo; alia, de naiva enamiĝinto... kaj la komedio finiĝas, la roluloj demetas la aktor-kostumojn, kaj ĉiuj vidiĝas egalaj, ĉu ne?

—Jes, ion tian mi vidis —diris Sancho.

—Nu, same okazas en la komedio kaj aferoj de ĉi mondo, kie unuj faras la rolon de imperiestroj; aliaj, de pontifo, kaj unuvorte, de ĉiaj personoj ludeblaj en teatraĵo; sed, kiam alvenas la fino, t.e. en la konsumiĝo de la vivo, la morto prenas de ili ties diferencigajn kostumojn, kaj ili ĉiuj egalas en la tombo.

—Bela komparo! —respondis Sancho—. Tamen, ne tre nova, ĉar mi jam aŭdis ĝin multe da fojoj, same kiel tion pri la ŝako: dum la ludo daŭras, ĉiu peco havas sian propran kaj specialan valoron, kaj, kiam finiĝas la partio, oni intermiksas, konfuzas kaj enpuŝas la pecojn en saketon, same kiel oni ŝovas la vivon en la tombon.

—Kun ĉiu tago, Sancho —diris don Quijote— vi fariĝas malpli naiva kaj pli saĝa.

—Jes, certe iom de la talento de via moŝto kroĉiĝis al mi —respondis Sancho—. La teroj sekaj kaj sterilaj fine donas bonajn fruktojn, se oni sterkas kaj kultivas ilin; mi volas diri, ke la konversacioj de via moŝto efikis kiel sterko sur la seka tero de mia sterila menso, kaj ke servi kaj akompani vin egalas al kultivado. Kaj mi esperas, ke propraj fruktoj kreskos de mi mem, tiaj, ke ili nek devios nek forglitos de la pado de la bona edukado, kiun via moŝto konstruis en mia dezerta inteligento.

Don Quijote ridis je la afektaj esprimoj de Sancho, sed opiniis vera kion la ŝildisto diris pri sia progreso, ĉar de

tempo al tempo li tiel parolis, ke li mirigis sian mastron; tamen, kiam li volis paroli grandstile kaj per rafinitaj rezonoj, plej ofte lia menso fine falis de la monto de lia simpleco en la abismon de lia nescio. Li montriĝis plej sprita kaj memorkapabla en sia uzo de proverboj, ĉu kongruaj kun la temoj traktataj, ĉu ne, kiel la legantoj sendube vidis kaj rimarkis laŭlonge de ĉi historio.

Per la ĵusa konversacio kaj per kelkaj aliaj ili pasigis grandan parton de la nokto, ĝis Sancho sentis la deziron fermi la kluzojn de siaj okuloj, kiel li ordinare diris, kiam li volis dormi; kaj demetinte la harnison de la azeno, li lasis ĝin paŝtiĝi laŭplaĉe sur la abunda herbo. Sed la selon de Rocinante li ne demetis, ĉar laŭ eksplicitaj ordonoj de lia mastro, li devis ne senseligi la ĉevalon, se ili vagadis sur la kampoj aŭ dormis ne subtegmente, en obeo al olda kutimo establita kaj konservata de la vagantaj kavaliroj. Oni povus demeti la bridon kaj pendigi ĝin de la pomelo; sed detiri la selon... tute ne! Sancho, observante ĉi kutimon, donis al Rocinante la saman liberon, kiel al la azeno. La amikeco inter ambaŭ bestoj estis eksterordinara kaj intima, ĝis tia grado, ke, laŭ famo transdirata de patroj al filoj, la aŭtoro de ĉi historio verkis pri la menciita amikeco kelke da ĉapitroj; tamen, por teni sin konsekvenca al la deco kaj noblo propraj al ĉi heroa historio, li decidis ne inserti la ĉapitrojn, kvankam kelkfoje li forgesas sian intencon por diri al ni, ke, tuj kiam la du bestoj kuniĝis, ili gratis unu la alian kontente kaj ĝislace; poste, sur la kolo de la azeno, Rocinante krucis la sian, tiel, ke duona ulno da ĝi elstaris transe; kaj ambaŭ bestoj, atente rigardante la grundon, kutime teniĝis tiamaniere dum tri tagoj aŭ, almenaŭ, tiel longe kiel oni permesis al ili, aŭ ĝis la malsato movis ilin serĉi manĝon. Mi diras, ke, laŭdire, la aŭtoro komparis ilian amikecon kun la amikeco ekzistanta inter Niso kaj Eŭrialo, aŭ inter Pilado kaj Oresto; kaj, se efektive tiel, tio pravas, kiel profunda devis esti la amikeco inter ĉi du pacaj bestoj, kapabla vekti ĝeneralan admiron kaj

ankaŭ honton inter la homoj, kiuj tiel ete scias amiki unuj al la aliaj. Tial oni skribis:

La amikoj ne amikas,
kaj la kanoj iĝas lancoj

Kaj tial oni kantis:

Amiko al amiko,
venena piko, ktp.

Oni ne opiniu, ke la aŭtoro iel ekstravagancis komparante la amikecon de ĉi du bestoj kun la amikeco de la homoj; verdire, la homoj lernis de la animaloj multe da gravaj aferoj kaj ricevis multe da lecionoj, por ekzemplo: de la cikonioj, la klisteron; de la hundoj, la vomon kaj la dankemon; de la gruoj, la priatenton; de la formikoj, la diligenton; de la elefantoj, la ĉaston; de la ĉevalo, la lojalon...

Fine Sancho endormiĝis ĉe la piedo de kork-arbo, kaj don Quijote dormetis ĉe la piedo de fortika kverko. Sed, apenaŭ pasis iom da tempo, vekis la hidalgon bruo malantaŭ li: don Quijote salte leviĝis, atente rigardis kaj streĉis la orelon ale al la loko, de kie la bruo venis, kaj vidis, ke tie troviĝas du surĉevalaj viroj, kaj ke unu el ili, deseliĝante, diras al la alia:

—Deĉevaliĝu, amiko, kaj senbridigu la bestojn: ŝajnas, ke en ĉi loko abundas la herbo por ili, kaj ankaŭ la silento kaj la soleco necesaj al miaj amaj pensoj.

Li diris tion kaj preskaŭ samtempe kuŝiĝis sur la tero; pro liaj movoj, la armaĵo, kiu lin kovris, faris grincon, kio montris al don Quijote, ke tie troviĝas alia vaganta kavaliro. Tiel do, la hidalgo alproksimiĝis al Sancho, ankoraŭ dormanta, tiris lin je la brako, per ne eta peno rekonsciigis lin el lia dormo kaj diris al li duonvoĉe:

—Frato Sancho, ion aventuran ni havas.

—Dio faru ĝin bona! —respondis la ŝildisto—. Kie troviĝas, kara mastro, tiu sinjorina moŝto Aventura?

—Kie, Sancho? —diris don Quijote—. Turnu la okulojn kaj rigardu: vi vidos tie kuŝantan kavaliron, kies animo, ŝajnas al mi, ne tre kontentas, se konsideri, ke mi vidas lin deĉevaliĝi kaj faligi sin sur la teron kun kelkaj elmontroj de ĉagreno kaj un forta grincado de lia armaĵo.

—Sed, de kie prenas via moŝto, ke tio estas aventuro?

—Mi ne volas diri —respondis don Quijote—, ke temas pri kompleta aventuro, sed pri ties komenco: ĉar la aventuroj tiel komenciĝas. Nu, aŭskultu: ŝajne li agordas liuton aŭ vjolon, kaj, se juĝi laŭ lia maniero kraĉi kaj gorĝobruj, li certe preparas sin por kanti ion.

—Vi pravas —diris Sancho—. Sendube temas pri enamiĝinta kavaliro.

—Ne ekzistas eĉ unu kavaliro ne amanta —respondis don Quijote—. Ni aŭskultu lin: se li kantos, la fadeno de liaj versoj kondukos nin ĝis la bobeno de liaj pensoj: ĉar, kiam la koro tro plenas, ĝi elverŝiĝas per la buŝo.

Sancho volis respondi al sia mastro, sed tion malhelpis la voĉo, nek tre bona, nek tre mava, de la Kavaliro de la Arbaro, kiu kantis jene, dum la hidalgo kaj Sancho aŭskultis atente:

Al mi preskribu leĝon, sinjorino,
ke mi submetu min al via volo:
de ĝi mi ne devios eĉ per colo
kaj sekvos ĝin rigore ĝis la fino.

Mi mortu, se vi volas, en kulmino

turmenta de aflikto, sen parolo.
Sed, se deziras vi, eĉ mem Amoro
informus vin pri mia kor-ruino.

Kontraŭaj elementoj en mi sidas:
ĉe mola vakso, diamanto dura;
sed mia koro sklavas sub la amo

do, mola aŭ malmola, vin konfidas.
Laŭplaĉe streku ĝin per ĉiz' gravura:
la markon mi konservos por ĉiamo.

La Kavaliro de la Arbaro finis sian kanton per suspiro ŝajne
veninta de la profundo de lia koro kaj iom poste kriis kun
trista kaj lamenta voĉo:

—Ho plej bela kaj sendanka virino de la universo! Ĉu eble
konsentos Via Sereneco, Casildea de Vandalia, ke ĉi kavaliro
sklavo via sin konsumu kaj pereu en senĉesaj vagadoj kaj en
rigoraj kaj daŭraj entreprenoj? Ĉu ne sufiĉas al vi, ke mi igis
konfesi al ĉiuj kavaliroj de Navarra, Andalucía, León, Castilla
kaj fine de La Mancha, ke vi elstaras kiel la plej bela damo
de la mondo?

—Ne tiel —diris don Quijote al Sancho—, ĉar mi estas de La
Mancha kaj nek konfesis ion tian, nek povus konfesi aferon
tiel ofendan al la belo de mia sinjorino. Vidu do, Sancho, ke
ĉi kavaliro deliras. Sed ni aŭskultu: eble li diros ion plian.

—Sendube —respondis Sancho—. Li ŝajnas preta lamentadi
almenaŭ unu tutan monaton.

Sed ne okazis tiel, ĉar la Kavaliro de la Arbaro, duonaŭdinte
paroli proksime, ĉesis lamenti, stariĝis kaj diris kun voĉo
sonora kaj ĝentila:

—Kiu iras tie? Kiu vi estas? Ĉu hazarde apartenas al la nombro de la feliĉaj, aŭ la la nombro de la afliktitaj?

—De la afliktitaj —respondis don Quijote.

—Proksimiĝu al mi —diris la Kavaliro de la Arbaro— kaj vi trovos, ke vi venas al la tristo kaj aflikto en persono.

Don Quijote, aŭskultinte tiel afablan kaj ĝentilan respondon, iris al li, Sancho faris same, la plendema kavaliro prenis la hidalgon je la brako kaj diris:

—Sidiĝu ĉi tie, sinjoro kavaliro vaganta; por kompreni ke vi estas tio, sufiĉas, ke vi troviĝas ĉi-loke en la akompano de la soleco kaj la roso de la nokto, naturaj litoj kaj sidejoj propraj al la vagantaj kavaliroj.

—Mi havas la profesion de vi menciitan —respondis don Quijote—, kaj, kvankam en mia koro sidas tristoj, misfortunoj kaj sortobatoj, tamen ili ne povis elpuŝi el ĝi la kompaton por alies malfeliĉo: el via ĵusa kanto mi komprenas, ke viaj misfortunoj havas la amon kiel kaŭzon, t.e. la amon al la sendanka belulino, kiun vi aludis en viaj lamentoj.

Jam side sur la dura tero ili plu babilis pace kaj konkorde, kvazaŭ poste, en la tagiĝo, ili ne rompus la kapon unu al la alia.

—Ĉu okaze, sinjoro, vi estas amanto? —demandis la Kavaliro de la Arbaro.

—Bedaŭrinde, jes —respondis don Quijote—. Tamen, la aflikton kaŭzatan de nobla sopiro ama oni devus prefere konsideri favoro, ne doloro.

—Vi pravus —diris la Kavaliro de la Arbaro— se la troaj disdegnoj ne konfuzus la racion kaj la juĝokapablon ĝis la

ekstremo ŝajni venĝoj.

—Neniam mia sinjorino min disdegnis —respondis don Quijote.

—Ne, efektive —aldonis Sancho, sidanta apud li—, ĉar la sinjorino mildas kiel ŝafideto kaj molas kiel butero.

—Ĉu ĉi viro estas via ŝildisto? —demandis la Kavaliro de la Arbaro.

—Jes —respondis don Quijote.

—Neniam ĝis nun mi vidis ŝildiston, kiu kuraĝus paroli, kiam lia mastro parolas —diris la Kavaliro de la Arbaro—. Almenaŭ pri mia ŝildisto, granda kiel lia patro, neniam oni povos diri, ke li apertas la buŝon, kiam mi parolas.

—Nu, bone —diris Sancho—. Mi ja parolis, kaj povus paroli ankaŭ antaŭ persono tiel... Sed ni lasu ĉi aferon: preferindas ĝin ne tuŝi.

La ŝildisto de la Kavaliro de la Arbaro prenis Sanchon je la brako kaj diris:

—Ni ambaŭ iru al ia loko, kie ni povos paroli ŝildiste laŭ nia plaĉo, kaj ni lasu, ke ĉi mastroj niaj litaniu unu la alian rakontante siajn respektivajn am-aferojn; certe venos la tagiĝo, antaŭ ol ili finos rakonti siajn konfidencojn.

—Volonte —respondis Sancho—. Kaj mi diros al via moŝto, kiu mi estas, por vidi, ĉu mi povos konkuri kun la plej parolemaj ŝildistoj.

Ĉe tio ambaŭ apartiĝis, kaj ilia konversacio estis tiel amuza, kiel serioza estis la konversacio de iliaj mastroj.

Ĉapitro 13

Kun la daŭrigo de la aventuro de la Kavaliro de la Arbaro kaj kun la saĝa, stranga kaj agrabla konversacio inter la du ŝildistoj

La ŝildistoj, apartiĝinte do de la kavaliroj, rakontis unu la alian pri siaj respektivaj vivoj, dum la mastroj parolis pri siaj amoj; sed la historio registras unue la konversacion de la servistoj kaj poste la babiladon de la kavaliroj. Tiel do, ĝi klarigas, ke jam aparte, la ŝildisto de la arbaro diris al Sancho:

—Vere, amiko, ni, ŝildistoj de vagantaj kavaliroj, suferas rigoran vivon. Ni ja manĝas nian panon en la ŝvito de nia vizaĝo, kio estas unu el la kondamnoj de Dio kontraŭ niaj unuaj patroj.

—Oni povas diri ankaŭ —respondis Sancho—, ke ni ĝin manĝas en la frosto de niaj korpoj, ĉar, kiu suferas la varmon kaj la fridon pli ol la povraj ŝildistoj de la vagantaj kavaliroj? Kaj estus ne tiel mave, se ni almenaŭ manĝus, pro tio, ke la zorgoj malpli premas, se panon oni tenas; sed okazas, ke kelkfoje ni eĉ trapasas unu du tagojn, nutrante nin per nur la vento blovanta.

—Ĉion tian oni povas elteni kaj suferi —diris la alia ŝildisto— se oni esperas ricevi rekompenco. Kaj vere, se vaganta kavaliro nur ne havas tro mavan sorton, lia ŝildisto vidas sin rekompencita post nelonge per la gubernatoreco de bela insulo aŭ per tre konvena grafolando.

—Mi jam diris al mia mastro, ke mi kontentus per la gubernatoreco de ajna insulo —respondis Sancho—, kaj li

estas tiel nobla kaj donacema, ke li promesis ĝin al mi en multaj kaj diversaj okazoj.

—Mi preferas ian kanonikecon por miaj servoj. Mia mastro jam rezervis unu por mi... vere impona!

—Certe via mastro apartenas al la eklezia kavalirismo, kaj tial li povas fari tiajn donacojn al siaj bonaj ŝildistoj; sed mia mastro estas nura laiko, kaj mi memoras, ke homoj saĝaj (kvankam ili ŝajnis al mi misvolaj) konsilis lin fariĝi ĉefepiskopo; li deziris nur esti imperiestro, tamen mi tremis de timo, pensante, ke li povus ŝanĝi sian opinion kaj eniri la Eklezion, kio tre damaĝus min, ĉar mi ne konsideras min kompetenta okupi religian postenon. Via moŝto ŝciu, ke, kvankam mi havas homan aspekton, mi estas tro besta por la ekleziaj aferoj.

—Ŝajnas al mi, ke via moŝto trompiĝas —respondis la ŝildisto de la arbaro—. La insulaj gubernatorecoj ne ĉiam konvenas: kelkaj estas tre feblaj; aliaj, paŭperaj; aliaj, deprimaj; kaj eĉ la plej firma kaj bona provizas per peza ŝarĝo da zorgoj kaj ĝenoj la kompatindulon, kiu fariĝis gubernatoro. Plej konvenus al ni, plenumantoj de ĉi servuta ofico ŝildista, reiri al niaj hejmoj kaj distri nin per pli agrablaj okupoj, kiel la ĉaso kaj la fiŝado, ĉar ne ekzistas en la mondo ŝildisto tiel paŭpera, ke li ne posedas ĉevalon, paron da levreloj kaj fiŝkanon por distri sin en sia vilaĝo.

—Nenio tia mankas al mi —diris Sancho—. Vere, mi ne havas ĉevalon, sed posedas azenon duoble pli valoran ol la ĉevalo de mia mastro. Aĉe traktu min Dio, jam de nun, se mi interŝanĝus mian azenon por lia ĉevalo, eĉ se plie li donus al mi kvar buŝelojn da hordeo. Eble via moŝto pensas, ke mi ŝercas, kiam mi taksas tiel valora mian grizulon: mi nomas tiel mian azenon pro ties griza koloro. Rilate al levreloj, ili ne

mankus al mi, se konsideri, ke ili tro multas en mia vilaĝo: kaj la ĉasado pli agrablas, kiam oni ĝin faras je alies kosto.

—Vere kaj sincere, sinjoro ŝildisto —respondis la alia—, mi jam intencis kaj decidis forlasi la idiotaĵojn de ĉi kavaliroj, reveni al mia vilaĝo kaj eduki miajn filojn: mi havas tri, kaj ili ŝajnas tri orientaj perloj.

—Mi havas du —diris Sancho—, kaj ili povus prezenti sin eĉ al la papo en persono, precipe mia knabino, kiun mi edukas, por ke ŝi fariĝu dukino, se Dio volos, kaj spite al ĉia patrino.

—Kiom da jaroj havas tiu damo edukata por esti dukino? —demandis la ŝildisto de la arbaro.

—Dek kvin, pli malpli; kaj ŝi sveltas kiel lanco, freŝas kiel aprila mateno kaj havas la forton de portisto.

—Kun tiaj kvalitoj, ŝi povus esti ne nur dukino, sed eĉ nimfo de la verda arbaro. Ho la putino, filino de putino! Grandan piĉon certe ŝi havas!

—Nek ŝi putinas, nek ŝia patrino putinis, nek ili putinos dum mi vivos, se Dio ne disponos alia —respondis Sancho iom kolere—. Kaj parolu pli ĝentile: ĉar viaj vortoj ne ŝajnas tre decaj, se konsideri, ke vi vivis inter vagantaj kavaliroj, kiuj estas la ĝentilo en persono.

—Ho sinjoro ŝildisto, vi apenaŭ komprenas la sencon de la komplimentoj! Ĉu vi ne scias, ke, kiam kavaliro bele lancas taŭron en la areno, la popolo ordinare diras: «Ho, putinema putinido, kiel majstre li lancas!», kaj ke, kio ŝajnas insulta vorto vere egalas al granda laŭdo? Kaj vi, sinjoro, devus fornei viajn filojn aŭ filinojn, se ili ne farus ion indan je tiaj laŭdoj.

—Nu, mi forneas ilin —respondis Sancho—, kaj pro la sama motivo vi povus ŝarĝi min, miajn gefilojn kaj edzinon per kompleta bordelo, se konsideri, ke ĉio, kion ili faras aŭ diras, meritas tian laŭdadon. Mi tre deziras denove vidi ilin, sekve mi preĝas al Dio, ke li gardu min de mortomerita peko, t.e. de ĉi danĝera ofico ŝildista, kien mi enfalis por la dua fojo, ĉar min logis kaj trompis burso kun cent dukatoj, kiun mi trovis en la interno de Sierra Morena; de tiam, la diablo svingas antaŭ miaj okuloj, tie, ie, transe kaj pretere, burson plenan de dublonoj, kaj ŝajnas al mi, ke ĉiupaŝe mi ĝin tuŝas per la manoj, kaj brakumas ĝin, kaj ĝin portas hejmen, kaj ĝin investas, kaj igas ĝin produkti renton, kaj mi vivas kiel princo; kaj, kiam mi pensas ĉion ĉi, mi eltenas facile kaj senpene ĉi vivon, kies rigorojn mi suferas kun la idiota mastro mia, kvankam mi scias, ke li havas pli da frenezulo ol da kavaliro.

—Tial oni diras, ke, kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan —diris la ŝildisto de la arbaro—. Kaj, se paroli pri frenezuloj, nenie en la mondo ekzistas alia kavaliro pli freneza ol mia mastro, ĉar oni povas apliki al li la proverbon: «Kiu por ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras»: efektive, por restarigi al alia kavaliro ties perditan racion, li mem ŝajnigas sin freneza kaj serĉas ion, kio, se trovita, mi ne scias, ĉu estos al li agrabla.

—Ĉu hazarde via mastro estas enamiĝinta?

—Jes, al ia Casildea de Vandalia, la damo plej kruda kaj fiera renkontebla en la tuta mondo. Sed li ne tre afliktiĝas de ŝia krudeco; verdire, en lia interno kaŝiĝas pli grandaj mensogoj, kaj ili elmontriĝos antaŭ ol pasos multaj horoj.

—Ne ekzistas vojo tiel plata, ke ĝi ne havas ian kavon aŭ truon —respondis Sancho—. En ĉiuj hejmoj kuiriĝas melongenoj, sed en la mia per kaldronplenoj.^[259] La frenezo

certe bezonas pli da kompanoj kaj kunuloj ol la saĝo. Sed se veras la ĝenerala diro, ke suferi kun kompano la malfacilojn helpas ilin venki, mi povas konsoli min kun via moŝto, tial, ke vi servas mastron, kiu estas tiel stulta kiel la mia.

—Stulta, sed kuraĝa; kaj pli fripona ol stulta kaj kuraĝa — diris la ŝildisto de la arbaro.

—Mia mastro ne estas tio —respondis Sancho—. Mi volas diri, ke li havas en si nenion friponan; kontraŭe, li posedas koron puran kiel akvo fonta, ne scias mave kondukti, faras bonon al ĉiuj, absolute ne malicas, kaj eĉ infano povus konvinki lin, ke noktas en la mezo de la tago. Pro tia simpleco mi amas lin kiel mian propran animon kaj ne kapablas cedi al la ideo forlasi lin, kiom ajn li ekstravagancas.

—Tamen, frato kaj sinjoro, se blindulo gvidas alian blindulon, ili ambaŭ riskas fali en foson. Ni farus plej bone, se ni revenus al niaj hejmoj per rapidaj paŝoj, ĉar la serĉantoj de aventuroj ne ĉiam trovas ilin bonaj.

Dum ili tiel interparolis, Sancho ofte kraĉis salivon algluiĝan kaj iom sekan; tion rimarkante, la bonkora ŝildisto de la arbaro diris:

—Ŝajnas al mi, ke, kaŭze de la babilado, la lango kvazaŭ algluiĝas al la palato; sed mi portas, alligitan al la sel-arko, bonegan rimedon kontraŭ la algluiĝo.

Kaj stariĝinte, li revenis iom poste kun granda boto plena de vino kaj kun pasteĉo duonulnon longa, kio ne estas troigo, ĉar ĝi konsistis el blanka kuniklo tiel granda, ke Sancho, ĝin tuŝante, kredis palpi, ne kapridon, sed kapron. Kaj li demandis:

—Ĉu via moŝto portas ĉion ĉi kun vi, sinjoro?

—Kion vi do pensis? —respondis la alia—. Ĉu vi prenis min por ia ŝildisto paŭpera? Mi portas sur la grupo de mia ĉevalo pli bonan viktualion ol generalo sur la vojo.

Oni ne bezonis insisti al Sancho, ke li manĝu, kaj en la obskuro de la nokto li glutadis pecojn grandajn kiel pugno.

—Via moŝto estas ja ŝildisto bona kaj perfekta, oficotaŭga kaj bele provizita, superba kaj granda, kion pruvas ĉi bankedo, kiu, se ne venis ĉi tien per sorĉarto, ŝajnas produkto de magio —diris Sancho—. Vi ne similas al mi, kiu estas paŭpera kaj senfortuna, kaj havas en la dusako nur peceton da fromaĝo (tiel dura, ke per ĝi oni povus frakasi la kapon de giganto) kaj krome kvar dekduojn da karboj kaj la saman kvanton da aveloj. Tia ŝparemo ŝuldiĝas al la opinioj kaj principoj observataj de mia mastro, nome, ke la vagantaj kavaliroj devas vivteni sin per nur sekaj fruktoj kaj herboj de la kamparo.

—Je mia fido, frato —respondis la ŝildisto de la arbaro—. Mia stomako tute ne taŭgas por la digesto de kardoj, arboradikoj aŭ sovaĝaj piroj. Iru al la diablo niaj mastroj kun siaj opinioj kaj kavaliraj leĝoj, kaj manĝu kion ili volas. Por ajna eventualo mi ĉiam portas fridan viandon kaj krome ĉi boton alligitan al la selarko, tiel amatan de mi, ke ĉiumomente mi kisas kaj brakumas ĝin milfoje.

Kaj, tion dirante, li metis la boton en la manojn de Sancho, kiu levis ĝin al sia buŝo kaj dum kvarono de horo tenis la rigardon fiksita sur la steloj; poste, kiam li finis trinki, li lasis sian kapon kliniĝi flanken kaj diris kun profunda suspiro:

—Ho la fripona putinido! Kiel bongustega!

—Ĉu vi ne vidas —interrompis la alia ŝildisto, aŭdinte la esprimojn de Sancho—, ke vi laŭdis ĉi vinon, nomante ĝin «putinido»?

—Vere, mi devas konfesi —respondis Sancho—, ke ne estas fifamige nomi iun putinido, se per tia vorto oni intencas lin laŭdi. Sed diru, sinjoro, je la vivo de la persono al vi plej kara, ĉu ĉi vino devenas de Ciudad Real?

—Eminenta spertulo! —kriis la ŝildisto de la arbaro—. Efektive, ĝi devenas de tie, ne de alia loko, kaj restis kelke da jaroj en la kelo.

—Tia klarigo! Ne pensu, ke mi ne divenis ankaŭ ĝian aĝon! —diris Sancho—. Ĉu ne bone, sinjoro ŝildisto, ke mi havas instinkton tiel grandan kaj naturan por la kono de la vinoj? Nur flarante guton, mi divenas ties landon, ties klason, ties guston, ties aĝon, ties ŝanĝiĝojn kaj ties ceterajn cirkonstancojn. Sed ne mirinde, se konsideri, ke sur la patra flanko de mia familio vivis la du plej bonaj gustumantoj de vino, kiajn La Mancha ne konis dum longa tempo. Pruve de tio, jen la rakonto pri io okazinta: oni petis ilin gustumi iom da vino el barelo kaj opinii pri ĝia stato, bono aŭ malbono. Unu gustumis ĝin per la pinto de la lango kaj diris, ke la vino havas feran saponon; la alia nur flaris kaj asertis, ke ĝi havas ledan saponon. La mastro respondis, ke la barelo estas pura, kaj ke la vino posedas nenian mikson, de kiu ĝi povus preni saponon feran aŭ ledan. Tamen la du famaj gustumantoj persistis en siaj respektivaj opinioj. Pasis la tempo, elvendiĝis la vino, kaj, kiam oni purigis la barelon, oni trovis en ĝi etan ŝlosilon alligitan al leda rimeno. Via moŝto diru do, ĉu homo devenanta de tia familio ne havas aŭtoritaton por doni sian opinion en similaj okazoj.

—Tial mi diras, ke ni devus ne plu serĉi aventuron. Kaj, ĉar ni havas panon, ni ne serĉu torton; ni revenu al niaj kabanoj, kaj Dio trovu nin tie, se Li volas.

—Mi plu servos mian mastron, nur ĝis ni alvenos al Zaragoza —respondis Sancho—. Tie ni traktos pri la afero.

Fine la du bonaj ŝildistoj tiel multe parolis kaj trinkis, ke la sonĝo bezonis senmovigi al ili la langon, kaj almenaŭ moderigi ilian soifon, ĉar ĝin plene estingi estus neeble. Kaj tiel ili endormiĝis, alkroĉitaj al la boto jam preskaŭ vaka, kaj kun la buŝo ankoraŭ plena de duonmaĉitaj viandopecoj. Ni lasos ilin tie dum ioma tempo por rakonti tion, kio okazis inter la Kavaliro de la Arbaro kaj la Kavaliro de la Trista Mieno.

[[259](#)] Proverba esprimo: ĉie troviĝas zorgoj kaj problemoj, sed ĉiu opinias la siajn plej grandaj.

Ĉapitro 14

Kun la daŭrigo de la aventuro de la Kavaliro de la Arbaro

La historio registras, ke, inter la multaj aferoj traktitaj de don Quijote kaj la Kavaliro de la Arbaro, ĉi lasta diris al nia hidalgo:

—Unuvorte, sinjoro kavaliro, sciu, ke mia destino, aŭ pli ĝuste, mia volonto kondukis min enamiĝi al la senegala Casildea de Vandalia; mi nomas ŝin senegala, ĉar neniuj egalas al ŝi en la grandeco de ŝia staturo, aŭ en la perfekteco de ŝia rango kaj belo; nu, ĉi Casildea rekompencis mian honestan amon kaj mian respektan deziron, trudante al mi, same kiel faris al Herkuleso lia duonpatrino, la plenumon de multaj kaj danĝeraj aventuroj, kaj promesante, ĉe la fino de ĉiu el ili, ke, ĉe la fino de la sekvanta, mi atingus la celon de mia espero; miaj entreprenoj sekvis unu la alian kiel ĉenero ĉeneron, tiamaniere, ke ili nekalkuleblas, kaj mi ne scias ankoraŭ, kiu estos la lasta kondukanta min al la kontentigo de miaj honestaj deziroj. Iam ŝi ordonis min iri defii al la fama gigantino de Sevilla nomata La Giralda,^[260] kuraĝa kaj forta, kvazaŭ farita el bronzo, kaj samtempe la plej ŝanĝiĝema kaj leĝera virino de la mondo, kvankam ŝi staras senmova. Mi iris kaj venkis ŝin kaj devigis ŝin resti trankvila kaj sen ŝanĝoj, ĉar dum pli ol unu semajno blovis nur la norda vento. Alifoje, Casildea sendis min subteni per miaj brakoj la ŝtonan figuron de la grandaj taŭroj de Guisando,^[261] kio estas entrepreno pli propra al persisto ol al kavaliro. Poste ŝi ordonis ke mi ĵetu min en la abismon de Cabra (terura kaj neimagineble danĝera ago) kaj prezentu al ŝi detalan raporton pri la sekretoj kaŝitaj en la profundo de tia

faŭko. Mi detenis la movon de La Giralda, subtenis la taŭrojn de Guisando, ĵetis min en la abismon kaj renkontis ĉion, kio kuŝas en ĝia fundo; dume miaj esperoj teniĝas morte mortaj, kaj ŝiaj ordonoj kaj disdegnoj vive vivaj. Nu, laste ŝi ordonis min iri tra la diversaj provincoj de Hispanujo kaj igi konfesi, al la kavaliroj tie vagantaj, ke ŝi estas la plej bela el la virinoj, kaj mi la plej kuraĝa kaj enamiĝinta kavaliro de la mondo; pro ĉi entrepreno mi jam vojaĝas la pliparton de la lando kaj venkis multe da kavaliroj, kiuj kuraĝis kontraŭdiri min. Sed al mi donas plejan gloron kaj fieron la fakto, ke mi venkis en persona duelo la faman kavalaron don Quijote de La Mancha kaj igis lin konfesi, ke mia Casildea pli belas ol lia Dulcinea; kaj kaŭze de ĉi triumfo mi konsideras, ke mi venkis la tutan kavalaron de la mondo, ĉar la menciita don Quijote jam antaŭe submetis ĉiujn senescepte; kaj pro tio, ke mi venkis lin, ties gloro, famo kaj honoro transiris al mia persono:

Ju pli da gloro la venkito tenas,
des pli da honor' al venkinto venas,^[262]

»do oni devas aldoni al mia kredito, kaj konsideri miaj, la nekalkuleblajn heroaĵojn de don Quijote.

Don Quijote miregis je la asertoj de la Kavaliro de la Arbaro, milfoje intencis nomi lin mensoga, kaj havis la vorton ĉe la pinto de la lango; sed li bridis sin tiel bone kiel li povis, ĉar li volis, ke la alia konfesu per sia propra buŝo sian mensogon. Tiel do, li flegme respondis:

—Pri tio, ke via moŝto venkis la pliparton de la vagantaj kavaliroj de Hispanio, kaj eĉ de la tuta mondo, mi diras nenion; sed mi dubas, ke vi venkis don Quijote de La Mancha. Eble temis pri alia persono simila al li, kvankam liaj similuloj cetere estas tre malmultaj.

—Kion! —ekkriis la Kavaliro de la Arbaro—. Mi ĵuras je la ĉielo super ni, ke mi duelis kontraŭ don Quijote kaj lin venkis kaj igis lin kapitulaci. Li estas viro de alta kresko, kun vizaĝo kava, membroj longaj kaj magraj, haroj duongrizaj, nazo agla kaj iom korva, mustaĉo granda, nigra kaj falanta; li batalas sub la nomo de Kavaliro de la Trista Mieno, kaj lia ŝildisto estas kampulo nomata Sancho Panza. La fama ĉevalo, kies flankoj li spronas, kaj kies bridon li direktas, nomiĝas Rocinante, kaj fine havas, kiel mastrinon de sia koro, iun Dulcinea de El Toboso, antaŭe nomatan Aldonza Lorenzo; kaj laŭ la sama sistemo, mi nomas mian damon Casildea de Vandalira, ĉar ŝi nomiĝas Casilda kaj naskiĝis en Andaluzio. Se tiom da indikoj ne sufiĉas ne sufiĉas por konfirmi la veron de miaj virtoj, jen mia glavo, kiu povus konvinki la skeptikecon mem.

—Trankviliĝu, sinjoro kavaliro, kaj aŭskultu kion mi volas diri al vi -respondis don Quijote—. Sciu, ke la don Quijote de vi menciita estas mia plej granda amiko en ĉi mondo, ĝis tia ekstremo, ke mi konsideras lin alia personiĝo de mi mem: juĝante vian ĝustan kaj precizan priskribon, mi ne dubas, ke vi venkis lin; aliflanke, mi vidas per miaj okuloj kaj tuŝas per miaj manoj ke ne eblas, ke li estis la dirita kavaliro, escepte se iu ajn el liaj multaj malamikoj sorĉistoj (unu el ili speciale persekutas lin) prenis lian figuron por lasi sin venki kun la celo senposedigi lin de la renomo, kiun li akiris sur la tuta konata mondo dank' al siaj heroaj faroj kavaliraj. Sciu ankaŭ, kiel konfirmon de miaj vortoj, ke antaŭ pli ol du tagoj la sorĉistoj malamikoj liaj transformis la figuron kaj personon de la bela Dulcinea de El Toboso en kampulinon krudan kaj vulgaran, kaj eble ili ŝanĝis laŭ la sama maniero vian don Quijote. Kaj se tio, kion mi diras, ne konvinkas vin pri la vero de miaj vortoj, jen antaŭ vi don Quijote mem, kiu piede, rajde, aŭ kiel ajn vi volus, pretas subteni ilin per siaj armoj.

Tion dirante li stariĝis, metis la manon sur la tenilon de la glavo kaj atendis la reagon de la Kavaliro de la Arbaro, kiu same respondis kun serena voĉo:

—Bona paganto ne diskutas pri la kontoj. Se mi povis venki vin transformita, sinjoro don Quijote, certe mi povas esperi revenki vin en propra persono. Sed tial, ke ne decas al kavaliroj uzi armilojn en la nokto, kiel banditoj kaj rabistoj, ni atendu la tagiĝon, por ke la suno vidu niajn farojn. Kaj estu kondiĉo de nia duelo, ke la venkinto metu sin je la dispono de la venkinto kaj faru ĉion, kion ĉi lasta postulos, se nur tiaj postuloj estas konformaj al la digno kavalaria.

—Mi tre volonte konsentas la kondiĉon —diris don Quijote.

Tion parolinte, la du kavaliroj direktis sin al siaj ŝildistoj kaj trovis ilin ronkantaj kaj en la sama teniĝo, en kiu la sonĝo ilin surprizis; la mastroj vekis ilin kaj ordonis, ke ili preparu iliajn ĉevalojn, ĉar, ĉe la tagiĝo, ambaŭ atakus unu la alian en sanga kaj feroca duelo. Ĉe tia sciigo Sancho rigidiĝis de miro kaj konsterno kaj timis, ke la vivo de lia mastro povus endanĝeriĝi, se konsideri ke la Kavaliro de la Arbaro plenumis grandan nombron da kuraĝaj prodaĵoj, laŭ diroj de lia ŝildisto; sed la du ŝildistoj senreplike iris serĉi la tutan gregon, t.e. la tri ĉevalojn kaj la azenon, ĉar, flarinte sin reciproke, ili restis kune. Survoje, la ŝildisto de la arbaro diris al Sancho:

—Sciu, frato, ke en Andaluzio, kiam oni duelas inter batalantoj, laŭkutime la sekundantoj ne devas stari kun krucitaj brakoj, dum iliaj ĉefoj atakas unu la alian. Tion mi diras, por averti vin, ke, kiam niaj mastroj batalos, ankaŭ ni devos batali kaj haki unu la alian en splitojn.

—Al tia kutimo, sinjoro ŝildisto —respondis Sancho—, teniĝu la friponoj kaj batalantoj, pri kiuj vi parolis, sed ne la ŝildistoj

de la vagantaj kavaliroj. Mi neniam aŭdis mian mastron menciigi tian kutimon, kvankam li scias parkere ĉiun regulon de la vaganta kavalirismo. Sed, eĉ se vere ekzistus difinita regulo ordonanta, ke ankaŭ la ŝildistoj batalu dum ilia sinjoro duelas, mi ne obeus ĝin, kaj anstataŭe pagus la punmonon trudatan en tiaj kazoj al pacaj ŝildistoj kiel mi, ĉar certe ĝi ne egalus al la kosto de du pundoj da vakso: kaj mi preferus pagi tiom, konsiderante, ke pli kostus al mi la ĉarpioj necesaj por kuraci al mi la kapon, kiun mi jam imagas fendita kaj splitita en du partojn. Krome al mi estas tute neeble batali: mi ne havas glavon kaj neniam en mia vivo portis ĝin.

—Mi konas bonan rimedon por tio —diris la ŝildisto de la arbaro—. Ĉi tie mi havas du tol-sakojn de la sama grandeco: vi prenos unu, mi la alian kaj ni faros sako-batalon per egalaj armiloj.

—Tiamaniere mi volonte konsentas —respondis Sancho—. La batalo pli taŭgos por deskui de ni la polvon ol por vundi nin.

—Ne estos tiel —diris la alia—. Por ke la vento ne efiku, ni metos seson da ŝtonoj glataj, nudaj kaj de egala pezo en ĉiun sakon, kaj tiamaniere ni povos bati nin reciproke per ili, sen fari al ni vundojn aŭ kontuzojn.

—Je Dio! —ekkriis Sancho—. Ĉu per tiaj feloj zibelaj kaj kotonaj flokoj vi volas eviti, ke ni frakasu al ni reciproke la kapon kaj la ostojn? Sed, eĉ se la sakoj plenus de silko-raŭpaj kokonoj, sciu, sinjoro, ke mi ne batalos; niaj mastroj batalu, la fortuno ilin akompanu, kaj dume ni trinku kaj vivu, konsiderante, ke la tempo faras al si la zorgon preni de ni la vivon, kaj ni ne bezonas klopodi ke ĝi finiĝu ekstersezono antaŭ ol atingi sian plenan maturiĝon.

—Tamen —respondis la ŝildisto de la arbaro— ni devas batali, eĉ se nur duonan horon.

—Tute ne! Mi ne estas tiel sendanka aŭ tiel senkonsidera, ke mi komencus eĉ la plej etan kverelon kun viro, ĉe kies flanko mi manĝis kaj trinkis; krome, kiel, je la diablo, mi povus sen kolero kaj ĉagreno batali fridsange?

—Ankaŭ por tio mi havas rimedon —respondis la ŝildisto de la arbaro—. Antaŭ ol ni komencos la batalon, mi ĝentile proksimiĝos al via moŝto, donos al vi du tri survangojn, kiuj faligos vin surteren, kaj tiel via kolero vekiĝos, eĉ se ĝi dormas pli profunde ol gliro.

—Kontraŭ tia artifiko mi konas alian ne malpli bonan —diris Sancho—. Mi prenos dikan vergon kaj, antaŭ ol via moŝto venos veki mian koleron, mi dormigos la vian per tiel forta draŝado, ke vi vekiĝos nur en la transa mondo, kie oni jam scias, ke mi ne estas tia viro, ke mi permesus al iu ajn pinĉi al mi la nazon. Ĉiu atentu siajn proprajn aferojn kaj prefere lasu sian koleron dormi, ĉar neniu konas la koron de la aliaj homoj; kiam oni iras preni lanon, ofte oni revenas pritondita, kaj Dio benis la pacon kaj kondamnis la disputojn. Se ajna kato persekutata, pelata kaj sieĝata en angulon, transformiĝas en leonon, nur Dio scias en kion povus ŝanĝiĝi mi, kiu estas homo; tial, sinjoro ŝildisto, mi deklaras, ke vi respondos pri la malbono kaj la damaĝo, kiuj povus rezulti el nia disputo.

—Tre bone —respondis la alia—. Ni atendu la tagiĝon, kaj tiam ni finos ĉi aferon.

Ĉe tio jam komencis trili en la arboj mil specoj de buntaj birdetoj kaj per siaj diversaj kaj gajaj kantoj ŝajnis bonvenigi kaj saluti la freŝan aŭroron, kiu jam ekmontris sian vizaĝon tra la pordoj kaj fenestroj de oriento, deskuante de siaj haroj

senfinan nombron da likvaj perloj, en kies klara likvoro ankaŭ la herboj donis la impreson elverŝi blankan kaj fajnan roson; la salikoj distilis dolĉan sukcon, la fontoj lirlis, la rojoj murmuris, la boskoj ĝojis kaj la herbejoj riĉiĝis per la alveno de la aŭroro.

Sed apenaŭ la helo de la tagiĝo permesis distingi la objektojn, la okuloj de Sancho vidis unue la nazon de la ŝildisto de la arbaro, tiel grandan, ke ĝi ĵetis ombrojn sur preskaŭ lian tutan korpon. Efektive, oni rakontas, ke ĉi nazo estis eksterordinare longa, kurba en la mezo, plena de verukoj kaj violkolora kiel melongeno; ĝi atingis ĝis du colojn sur lia buŝo kaj ĝis tia ekstremo turpigis lian vizaĝon per siaj granda, koloro, verukoj kaj kurbiĝo, ke, kiam Sancho vidis ĝin, liaj manoj kaj piedoj skuiĝis, kvazaŭ li estus infano en epilepsia kolapso; kaj li decidis en si, eventuale ricevi senproteste du cent survangojn, prefere ol vekti sian koleron por interbatiĝi kun tia monstro.

Don Quijote observis sian kontraŭulon, sed ĉi lasta jam antaŭe surmetis la helmon kaj mallevis la vizieron, tiel, ke la hidalgo ne povis vidi al li la vizaĝon. Tamen li rimarkis, ke li estas viro fortika, kvankam ne altakreska. Sur la armaĵo li portis specon de kazako aŭ kuto teksita el fajna oro punktita per multaj disketoj el brila vitro, kio donis al li aspekton ekstreme luksan kaj elegantan; super lia helmo flirtis granda nombro da plumoj verdaj, blankaj kaj flavaj; lia lanco, apogita al arbo, vidiĝis granda kaj dika, kaj ĝin garnis ŝtala pinto pli ol unu spanon longa. Ĉion vidinte kaj rimarkinte, don Quijote pensis, ke ĉi kavaliro certe havas grandan forton; sed li ne sentis timon, kiel Sancho; male, li diris kun brava teniĝo al la Kavaliro de la Speguloj:

—Se via deziro dueli ne konsumis vian ĝentilon, sinjoro kavaliro, mi petas vin levi iomete vian vizieron, ke mi vidu, ĉu via vizaĝo respondas al la brilo de via aspekto.

—Ĉu vi venkos, ĉu ne, ĉe la fino de nia duelo vi havos pli ol sufiĉan tempon por rigardi min. Kaj mi ne kontentigas nun vian deziron, ĉar ŝajnas al mi, ke mi ofendus la belan Casildea de Vandalia, prokrastante per la levo de la viziero la momenton devigi vin konfesi tion, pri kio vi jam scias.

—Nu, dum ni surseliĝas —respondis don Quijote—, vi povus diri al mi, ĉu mi estas la sama don Quijote, kiun vi venkis laŭ vi.

—Al tio mi respondas, ke vi tiel similas lin, kiel ovo ovon, sed pro tio, ke vi diras, ke sorĉistoj vin persekutas, mi ne kuraĝas aserti, ke vi kaj li estas la sama persono.

—Tio sufiĉe montras al mi, ke vi trompiĝis —diris don Quijote—. Tamen, por ke vi tute konvinkiĝu, ke vi falis en eraron, ni surseliĝu kaj en malpli da tempo ol vi bezonus por levi vian vizieron, mi vidos vian vizaĝon (se Dio, mia damo kaj mia brako tion permesos), kaj vi konstatos, ke mi ne estas la venkita don Quijote, kiun vi imagas.

Senplie ili surseliĝis, don Quijote turnis Rocinante per la brido kaj rajdis kelkan spacon necesan por algalopi kontraŭ la oponenton. La Kavaliro de la Speguloj faris same, sed, apenaŭ la hidalgo distanciĝis dudek paŝojn, la alia vokis lin, kaj don Quijote returnis la duonon de la vojo.

—Ne forgesu, sinjoro kavaliro —klarigis la spegululo—, ke, laŭ la kondiĉo de nia duelo, la venkito devos submeti sin al la volo de la venkinto.

—Mi jam scias —respondis don Quijote—. Kaj mi konsentas, nur se oni ne trudos al la venkito ion kontraŭan al la leĝoj de la kavalirismo.

—Tiel mi komprenas la aferon —diris la Kavaliro de la Speguloj.

Tiam la stranga nazo de lia ŝildisto prezentiĝis al la okuloj de don Quijote, kiu miris ne malpli ol Sancho, ĝis la ekstremo, ke li juĝis la ŝildiston ia monstro, aŭ ia nova speco homa, rara en la mondo.

Sancho, vidante sian mastron ekiri, ne volis resti sola kun la nazulo; li timis, ke per unu sola frapo de tia nazo kontraŭ la lian, la batalo finiĝus, ĉar li falus sur la teron, ĉu pro la frapo, ĉu pro la teruro. Li do teniĝis apud sia mastro alkroĉiĝante al la piedinga rimeno de Rocinante, kaj, kiam ŝajnis al li, ke don Quijote tuj haltus por turniĝi kaj atake alkuri, li diris:

—Mi petas vian moŝton, sinjoro, helpi min grimpi sur tiu korkarbo, antaŭ ol vi turniĝos kaj algalopos. De tie mi povos vidi, pli bone ol de la tero, vian grandiozan duelon kun ĉi kavaliro.

—Mi ja kredas, Sancho —diris don Quijote—, ke vi volas grimpi ĝis la alto por vidi sendanĝere la taŭrojn.^[263]

—Se diri la veron —respondis Sancho—, la monstra nazo de tiu ŝildisto tiel konsternas kaj teruras min, ke mi ne kuraĝas resti ĉe lia flanko.

—Certe, ĝi tiel imponas —diris don Quijote—, ke se mi ne estus, kia mi estas, ankaŭ mi konsterniĝus; venu do, mi helpos vin grimpi, kiel vi volas.

Dum la hidalgo haltis kaj helpis sian ŝildiston supri la korkarbon, la Kavaliro de la Speguloj rajdis ĝis la punkto, kiu ŝajnis al li konvena por fari la turnon; kaj supozante, ke ankaŭ don Quijote faris la samon, li haltigis per tiro de la bridoj sian ĉevalon (kiu estis nek pli rapida nek pli bon-aspekta ol Rocinante), turniĝis kaj, sen atendi sonon de trumpeto aŭ alian signalon de starto, impetis plengalope (kio efektive egalas al modera troto) rekte kontraŭ sian

malamikon. Sed kiam li vidis, ke don Quijote okupiĝis helpante Sanchon grimpi, li tiris je la brido kaj haltis en la mezo de la kurado, kio ege plaĉis al la ĉevalo nekapabla plu moviĝi.

Don Quijote, imagante, ke lia malamiko venas kvazaŭ fluge sur lin, enpikis abrupte la spronojn en la kavajn flankojn de Rocinante, kaj tiel vekis ĝin, ke, kiel rakontas la aŭtoro de ĉi historio, nur ĉi-foje ĝi iom galopis, ĉar en la aliaj okazoj temis pri simplaj trotoj; kun ĉi nekutima impeto la hidalgo kuris ĝis la loko, kie la Kavaliro de la Speguloj enpikadis ĝistige la spronojn en la ventron de sia ĉevalo, sen ke li povus movi la beston eĉ unu colon de kie ĝi estis.

En ĉi favora momento kaj cirkonstanco, don Quijote trovis sian malamikon embarasata pro la ĉevalo kaj okupata per la lanco, kiun li ne povis meti en atakan pozicion pro manko de tempo aŭ de lerto. Sen konsideri lian malavantaĝon, don Quijote, tute facile kaj sen ia danĝero, alsaltis sur la Kavaliron de la Speguloj tiel forte, ke ĉi lasta malgraŭvole elpafiĝis super la gropon de sia ĉevalo kaj falis pezege sur la grundon, kie li restis kvazaŭ morta, sen moveti piedon aŭ manon.

Sancho, apenaŭ vidis lin fali, deglitis de la alto de la korkarbo kaj hastis al sia mastro, kiu, deseliĝinte de Rocinante, klinis sin super la Kavaliro de la Speguloj, delaĉis ties helmon por vidi, ĉu li mortis, aŭ por ebligi, ke la aero lin revigligu, se li plu vivis. Kaj don Quijote tiam observis... ĉu eblas diri kion li observis, sen veki admiron, miron kaj konsternon ĉe la legantoj? Rakontas la historio, ke li vidis la saman vizaĝon, la saman figuron, la saman aspekton, la saman fizionomion, la saman mienon de la bakalaŭro Sansón Carrasco. Kaj, vidante lin, la hidalgo laŭtis:

—Venu Sancho, kaj rigardu kion vi vidos kaj ne kredos. Rapiĉu, filo, kaj rimarku kion vi povas fari la magio kaj kion kapablas la sorĉistoj.

Sancho alvenis, kaj, ĉe la vido de la vizaĝo de la bakalaŭro Carrasco, komencis fari al si milfoje la signon de la kruco. Dume, la renversita kavaliro montris nenian simpton de vivo, kaj Sancho diris al don Quijote:

—Mi opinias, sinjoro, ke ĉiaokaze via moŝto devus enpuŝi vian glavon en la buŝon de ĉi viro simila al la bakalaŭro Sansón Carrasco; eble vi mortigus en li unu el viaj malamikoj sorĉistoj.

—Sekvinda konsilo. Ju malpli da kontraŭuloj, des pli bone — respondis don Quijote.

Li elingis la glavon por plenumi la ideon kaj konsilon de Sancho, sed tiam la ŝildisto de la Kavaliro de la Arbaro, jam sen la hidiga nazo, proksimiĝis kriante:

—Via moŝto atentu, sinjoro don Quijote! La kuŝantoj ĉe viaj piedoj estas la bakalaŭro Sansón Carrasco, via amiko; kaj mi, lia ŝildisto.

Sancho, vidante lin sen la aĉa apendico, demandis:

—Kaj la nazo?

—Ĉi tie, en mia poŝo —respondis la alia. Kaj metinte la manon en la dekstran poŝon, li eltiris masko-nazon el vernisita kartono kun la formo kaj aspekto jam menciitaj.

Sancho rigardis lin ĉiufoje pli fikse, kaj fine diris laŭte kaj mire:

—Je Dio kaj Sankta Maria! Ĉu vi ne estas Tomé Cecial, mia najbaro kaj amiko?

—Jes, certe —respondis la ŝildisto jam sennaza—. Mi estas Tomé Cecial, amiko Sancho, kaj tuj diros al vi, kiaj artifiko, projektoj kaj volo kondukis min ĉi tien. Dume, humile petu vian sinjoron ne tuŝi, mistrakti, vundi aŭ mortigi la Kavaliron de la Speguloj, kiu kuŝas sur viaj piedoj, ĉar ververe li estas la kuraĝa kaj miskonsilita Sansón Carrasco, nia samvilaĝano.

Ĉi tio la Kavaliro de la Speguloj rekonsciiĝis, kaj tiam don Quijote metis la pinton de sia nuda glavo sur lia vizaĝo kaj diris:

—Jam konsideru vin morta, kavaliro, se vi ne konfesas, ke la senegala Dulcinea de El Toboso superas laŭ belo vian Casildea de Vandalia; krome, promesu (se vi postvivos ĉi duelon kaj venkitekton) iri al la urbo El Toboso kaj prezenti vin al ŝi je mia nomo, ke ŝi disponu pri vi laŭ sia bontrovo; kaj, se ŝi lasos vin libera, vi devos denove renkonti min (la spuro de miaj prodaĵoj gvidos vin ĝis la loko, kie mi troviĝos) por diri al mi kio eventuale okazis inter ŝi kaj vi; vi konsentis ĉi kondiĉon antaŭ ol ni duelis, kaj ĝi konformas al la reguloj de la vaganta kavalirismo.

—Mi konfesas —diris la falinta kavaliro—, ke pli valoras unu eluzita kaj makulita ŝuo de via sinjorino Dulcinea de El Toboso, ol la miskombita, sed pura barbo de Casildea; kaj mi promesas iri al via damo, reveni antaŭ vi kaj informi vin pri ĉio, kion vi deziras scii.

—Vi same devas konfesi kaj kredi —aldonis don Quijote—, ke la kavaliro de vi venkita nek estis, nek povis esti don Quijote de La Mancha, sed alia persono al li simila; same kiel mi konfesas kaj kredas, ke, kvankam vi ŝajnas la bakalaŭro Sansón Carrasco, vi estas alia homo kun lia aspekto, kaj ke

miaj malamikoj donis al vi ĉi tiun figuron, ke mi bridu kaj moderigu la forton de mia kolero, kaj kondutu indulge en mia glora venko.

—Ĉion ĉi mi konfesas, opinias kaj sentas, same kiel vi mem kredas, opinias kaj sentas —respondis la disbatita kavaliro—. Lasu min stariĝi, mi petas, se tion permesas mia frapiĝo el la falo, ĉar ostoj min doloras.

Don Quijote helpis lin leviĝi, kaj same lia ŝildisto Tomé Cecial, de kies persono Sancho ne povis deturni la rigardon, kaj kies respondoj al liaj demandoj montris, ke, kiel li diris, li vere estas Tomé Cecial; sed la timo, kiun vekis en Sancho la diroj de lia mastro, ke sorĉistoj transformis la figuron de la Kavaliro de la Speguloj en la figuron de la bakalaŭro Carrasco, ne lasis lin kredi kion liaj propraj okuloj vidis.

Fine la mastro kaj la servisto plu teniĝis al sia trompiĝo, kaj la Kavaliro de la Speguloj kaj lia ŝildisto, kapklinaj kaj ĉagrenitaj, disiĝis de don Quijote kaj Sancho, kun la intenco serĉi lokon, kie oni povus plastri kaj splinti la ripojn de la kavaliro. Don Quijote kaj Sancho denove ekiris ale al Zaragoza, kaj ĉi historio lasas ilin sur la vojo por doni klarigon pri la identeco de la Kavaliro de la Speguloj kaj de ties granda-naza ŝildisto.

[260] Aludo al la bronza figuro, kiu funkcias kiel ventoflago sur la supro de la granda turo de la katedralo de Sevilla. Ankaŭ la turo ricevas la nomon de la figuro: la Giralda (la Girulino).

[261] Temas pri kvar tre antikvaj ŝtonaj figuroj, longaj per dek du aŭ dek tri spanoj, larĝaj per ok, kaj dikaj per kvar. Ili staras ĉe la vilaĝo Guisando (provinco Ávila).

[262] Versoj, iom modifitaj de Cervantes, el la epopeo *La Araucana* de la poeto Alonso de Ercilla (1533-1594).

[263] Familiara esprimo aluda al la personoj, kiuj ŝatas vidi de sekura loko la danĝeron, kiel la spektantoj de taŭrludoj.

Ĉapitro 15

Kie oni rakontas kaj informas pri la personoj de la Kavaliro de la Speguloj kaj de ties ŝildisto

Ekstreme ĝoja, fiera kaj fanfarona vidiĝis don Quijote pro sia venko super tiel kuraĝa kavaliro, kia li imagis la Kavaliron de la Speguloj, de kies kavalireska promeso li esperis scii, ĉu la ensorĉo de lia sinjorino daŭris ankoraŭ, ĉar certe la venkito revenus (kaj se ne, li perdus sian kavaliran honoron) por informi lin pri sia renkontiĝo kun ŝi. Sed don Quijote pensis unu aferon, kaj la Kavaliro de la Speguloj alian, pro tio, ke, kiel dirite, li havis la solan zorgon trovi lokon, kie oni povus plastri lin.

Rakontas nun nia historio, ke, kiam la bakalaŭro Sansón Carrasco instigis don Quijote reveni al siaj forlasitaj aventuroj, li tion faris post ol li konsiliĝis kun la pastro kaj la barbiro pri la rimedo uzebla por persvadi la hidalgon resti trankvila kaj sekura ĉe si, sen ke lia damninda manio serĉi aventurojn renversus plu lian cerbon. En la menciita interkonsiliĝo ili decidis, per unuanima voĉo kaj post speciala insistado de Carrasco, lasi la hidalgon denove foriri, ĉar ŝajnis neeble reteni lin, kaj poste la bakalaŭro, en kavalira armaĵo, devus renkonti lin sur la vojo, dueli kontraŭ li —ne mankus preteksto por tio— kaj venki lin —facila afero, laŭ ili— post ol la du kavaliroj venus al la akordo, ke la venkito submetiĝu al la venkinto; tiel la bakalaŭro-kavaliro ordonus la venkitan hidalgon reveni al sia vilaĝo kaj hejmo kaj resti tie du jarojn, aŭ ĝis oni ordonus al li alion. Evidente don Quijote, venkite, plenumus plej rigore la ordonon por ne oponi kaj rompi la leĝojn de la kavalirismo; kaj en la tempo

de sia enfermiteco, eble li forgesus sian manion, aŭ oni povus trovi rimedon por resanigi lin de lia frenezo.

Carrasco do prenis sur sin ĉi entreprenon, kaj Tomé Cecial, viro de gaja kaj sprita karaktero, amiko kaj najbaro de Sancho Panza, sin proponis servi ŝildiste. Carrasco armis sin kiel menciite, kaj Tomé Cecial surmetis la falsan nazon maskan jam priskribitan, por ke lia amiko ne rekonu lin en ilia renkontiĝo. Tiel do, ili sekvis la saman vojon kiel don Quijote, preskaŭ ĉeestis la aventuron de la ĉaro de la Morto kaj fine atingis lin en la arbaro, kie okazis tio, kion la atenta leganto jam scias. Kaj se la eksterordinara fantazio de don Quijote ne konvinkus lin, ke la bakalaŭro ne estas la bakalaŭro, ĉi sinjoro bakalaŭro neniam povus plu studi kaj ricevi la diplomon de licenciulo pro tio, ke, kie li esperis trovi birdojn, li renkontis eĉ ne nestojn.

Tomé Cecial, vidante, kiel iliaj planoj fuŝiĝis, kaj kiel mizere finiĝis ilia vojaĝo, diris al la bakalaŭro:

—Certe ni ricevis kion ni meritas, sinjoro Sansón Carrasco. Tre facilas projekti kaj komenci entreprenon, sed ofte nur pene oni povas eltiri sin el ĝi. Don Quijote estas freneza, kaj ni prudentaj. Tamen li foriras nedifektita kaj ridanta, dum via moŝto statas muelita kaj trista. Diru do: kiu pli frenezas? La vere freneza aŭ la memvole freneza?

—La diferenco inter la du frenezuloj estas, ke la vera ne povas ne frenezi; kaj la memvola frenezas, kiam li deziras — respondis Sansón.

—Se tiel do, mi estis memvole freneza —diris Tomé Cecial— kiam mi fariĝis ŝildisto de via moŝto; sed same memvole mi deziras forlasi mian postenon kaj reveni hejmen.

—Tion vi povas fari —respondis Sansón—. Sed estus absurde imagi, ke ankaŭ mi revenos hejmen, sen antaŭe tradraŝi don

Quijote. Ne la deziro, ke li retrovu sian racion, sed la deziro min venĝi puŝas min nune serĉi lin: la intensa doloro de miaj ripoj ne permesas, ke mi persistu en mia filantropia projekto.

Ili plu parolis tiel, ĝis ili alvenis al vilaĝo, kie bonŝance ili trovis kiropraktikiston, kiu resanigis la povran Sansón. Tomé Cecial ekiris hejmen, kaj la bakalaŭro restis tie kovante sian venĝon. Nia historio denove parolos siatempe pri li, sed nun ĝi devas ĝoji kun don Quijote.

Ĉapitro 16

Pri la renkonto de don Quijote kun saĝa kavaliro de
La Mancha

Ĝoja, memkontenta kaj fiera, kiel dirite, don Quijote daŭrigis la vojaĝon; li imagis, ke pro sia ĵusa venko, li estas la plej kuraĝa kavaliro de sia epoko kaj de la mondo; konsideris, ke ĉiuj aventuroj de li entreprenotaj nepre havos feliĉan finon; disdegnis la ensorĉojn kaj la sorĉistojn; ne plu memoris pri la nekalkulebla nombro da vergoj ricevitaj en la sinsekvo de siaj kavaliraĵoj, nek pri la ŝtonbato renversinta la duonon de liaj dentoj, nek pri la sendankeco de la galeruloj, nek pri la insolento kaj la pluvo da vergoj de la janguanoj; fine, li diris en si, ke se li eltrovus la arton, sistemon kaj manieron elsorĉi sian sinjorinon Dulcinea, li ne envidus la fortunon de la plej feliĉaj kavaliroj de la pasintaj epokoj.

Ĉio ĉi plene okupadis lian penson, kiam Sancho diris al li:

—Ĉu ne strange, sinjoro, ke mi vidas ankoraŭ antaŭ miaj okuloj la misproporcion kaj teruran nazon de mia najbaro Tomé Cecial?

—Ĉu eble vi kredas, Sancho, ke la Kavaliro de la Speguloj estas la bakalaŭro Carrasco, kaj lia ŝildisto via amiko Tomé Cecial?

—Mi ne scias kion kredi —respondis Sancho—. Mi scias nur, ke lia priskribo de mia domo, edzino kaj infanoj povus veni nur de li mem, kaj ke lia vizaĝo, kiam li demetis la nazon, estas la sama vizaĝo de Tomé Cecial, kiun mi vidis multe da fojoj en la vilaĝo, ĉar nur unu muro staris inter lia hejmo kaj la mia; kaj la tono de lia voĉo estis ankaŭ la tono de Cecial.

—Ni bone konsideru la aferon, Sancho —diris don Quijote—. Aŭskultu: ĉu havas logikon, ke la bakalaŭro Sansón Carrasco venus en la formo de vaganta kavaliro, kun atakaj kaj defendaj armiloj, batali kontraŭ mi? Ĉu mi estis iam lia malamiko? Ĉu iam mi donis al li motivon, por ke li sentu misvolon al mi? Ĉu mi estas lia rivalo? Ĉu ni pensu, ke li alprenis la profesion de la armoj, ĉar li ĵaluzas la gloron, kiun mi akiris per ili?

—Kaj kion diri, sinjoro, pri la venkita kavaliro, kiu ajn li estas, tiel simila al la bakalaŭro Carrasco, kiel lia ŝildisto al mia amiko Tomé Cecial? Kaj se temas pri ensorĉo, kiel via moŝto asertas, ĉu ne ekzistis en la mondo aliaj du personoj, kies aspekton la sorĉistoj povis uzi por fari la transformon?

—Temas nur pri artifiko kaj maĥinacioj de la perversaj sorĉistoj, kiuj min persekutas —respondis don Quijote—. Antaŭvidante, ke mi venkus en la duelo, ili zorgis, ke la venkita kavaliro montru la vizaĝon de la bakalaŭro, por ke mia amikeco al li detenu la rigoron de mia brako kaj de mia tranĉa glavo kaj moderigu la justan koleron de mia koro; tiel li povis savi sian vivon, kvankam li klopodis preni de mi la mian per artifiko kaj trompoj. Pruve de tio, vi mem, Sancho, scias per propra, netrompebla sperto, ke la sorĉistoj facile ŝanĝas ajnan vizaĝon en alian, turnante la belon en turpon kaj la turpon en belon. Antaŭ malpli ol du tagoj vi vidis per viaj propraj okuloj la belon kaj gracion de la senegala Dulcinea en ties plena kaj natura aspekto, dum mi vidis ŝin en la aĉa kaj plumpa figuro de naŭza kampulino kun okuloj mukaj kaj buŝo fetora. Do, se la maligna sorĉisto kuraĝis fari tiel abomenindan transformon, ne strange, ke li faris ankoraŭ alian, utiligante la eksteran aspekton de Sansón Carrasco kaj de via najbaro por forpreni de miaj manoj la gloron de mia venko. Malgraŭ ĉio, min konsolas la penso, ke, kies ajn figuron alprenis mia malamiko, mi venkis lin.

—Nur Dio scias la veron pri ĉio —diris Sancho. Kaj, ĉar la ŝildisto sciis, ke la metamorfozo de Dulcinea estis nur trompo kaj artifiko lia, la ĥimeraj rezonoj de lia mastro ne konvinkis lin; sed li ne volis respondi, pro la timo diri ion, kio povus riveli lian mistifikon.

Ili tiel babiladis, kiam, de malantaŭe, atingis ilin viro, kiu rajdis samvoje sur tre bela ĉevalino bruna, en kapoto el fajna drapo verda franĝita per ruĝa veluro, kaj kun ĉasista ĉapo el la sama veluro. La ĉevalina harniso, kun kampa selo kaj kurtaj piedingo-rimenoj, havis koloron violan kaj verdan. Araba cimitaro pendis de lia larĝa balteo ora kaj verda, kaj liaj botoj estis el la sama ledo kiel la balteo. Liaj spronoj, ne orkoloraj, sed kovritaj per verda lako tre polurita kaj brila, kongruis kun la tuto de lia kostumo kaj aspektis pli bele, ol se ili estus el pura oro.

Kiam li atingis ilin, la vojaĝanto ĝentile salutis, kaj, spronante la ĉevalinon, komencis ilin preterrajdi, sed don Quijote diris al li:

—Se via moŝto, brila sinjoro, iras nian saman vojon kaj ne havas urĝon, vi farus al mi favoron, se ni vojaĝus kune.

—Se diri la veron —respondis la alia—, mi ne devancus vin, se mi ne timus, ke la apudesto de mia ĉevalino povas disturbi vian ĉevalon.

—Sinjoro, tute ne zorgu bridi vian ĉevalinon —intervenis Sancho—. Nia ĉevalo estas la plej bone edukita kaj ĉasta en la tuta mondo; neniam en ĉi tiaj okazoj li miskondutis, kaj, kiam unu fojon ĝi translimiĝis fari nedecaĵon, mi kaj mia sinjoro pagis sepoble ĝian kapricon. Via moŝto haltu, se vi volas, ĉar, eĉ se oni proponus vian ĉevalinon inter du pladoj al nia ĉevalo, ĉi lasta tute ne atentus ŝin.

La vojaĝanto haltis bridante kaj rigardis kun miro la vizaĝon kaj la teniĝon de don Quijote, kies helmon portis Sancho kiel valizon sur la antaŭo de la ŝarĝo-selo de la azeno; kaj ju pli la viro en verdo rigardis la hidalgon, des pli la hidalgo rigardis la viron en verdo kaj opiniis lin persono de solida saĝo. Li ŝajnis ĉirkaŭ kvindekjara, kun apenaŭ grizaj haroj, kun vizaĝo longa kaj kava kaj kun okuloj duone seriozaj, duone gajaj; resume, pro siaj kostumo kaj aspekto, li donis la impreson esti homo de bonaj kvalitoj.

De sia flanko, la viro en verdo pensis, ke neniam antaŭe li vidis iom similan al la figuro aŭ mieno de don Quijote; li miris je la longo de lia kolo, je la grandeco de lia korpo, je la kaveco kaj flavo de lia vizaĝo, je liaj armiloj, gestoj kaj teniĝo; kaj konkludis en si, ke jam de tre longe ne vidiĝis en tiu lando persono de lia speco kaj ŝajno.

Don Quijote, observante ke la vojaĝanto rigardas lin atente, kaptis la scivolan miron de liaj okuloj. Kaj pro tio, ke la hidalgo estis tiel ĝentila kaj komplezema, li antaŭiĝis al liaj demandoj, dirante:

—Ne surprizus min, se via moŝto surpriziĝus de mia mieno, tiel eksterkutima kaj diferenca de la ordinaraj. Sed vi ĉesos miri, kiam mi diros al vi, kiel mi nun diras, ke mi estas unu el la kavaliroj irantaj,

kiel diras la popolo
por serĉadi aventurojn.^[264]

»Mi forlasis mian landon, hipotekis mian bienon, rezignis mian komforton kaj ĵetis min en la brakojn de la Fortuno, por ke ĝi konduku min laŭ sia bontrovo. Mi entreprenis revivigi la mortintan kavalirismon, kaj jam de multaj tagoj, stumblante ie, falante tie, forglitante en abismon transe kaj relevante min pretere, plenumis grandan parton de mia

projekto, nome, helpi vidvinojn, protekti pucelojn, favori edzinojn, orfojn kaj zorgatojn, kio estas natura funkcio de la vagantaj kavaliroj; nu, kaŭze de miaj multaj faroj kuraĝaj kaj kristanaj, oni trovis, ke ili havas sufiĉan meriton por aperi presitaj en preskaŭ ĉiuj regnoj de la mondo. Jam eldoniĝis tridek mil volumoj de mia historio, kaj ekzistas solidaj motivoj por pensi, ke ĝi aperos tridek milionojn da fojoj, se la ĉielo ne oponos. Fine, por ĉion resumi per kelkaj vortoj, aŭ per nur unu, mi diras, ke mi estas don Quijote de La Mancha, alinome la Kavaliro de la Trista Mieno; kiel sciante, oni degradiĝas, sin laŭdante, tamen mi devas kelkfoje laŭdi min, en la okazoj kiam, kompreneble, ne ĉeestas aliaj personoj, kiuj povus fari mian laŭdadon; tiel do, nobla sinjoro, nek ĉi ĉevalo, nek ĉi lanco, nek ĉi ŝildo, nek ĉi ŝildisto, nek la tuta kompleto de ĉi armoj, nek mia flava vizaĝo, nek mia skeleta figuro devus plu surprizi vin, se consideri, ke vi jam konas min kaj mian profesion.

Tion dirinte, don Quijote ĉesis paroli, kaj la viro en verdo longe silentis, ĉar li ne ŝajnis kapabla trovi la ĝustan respondon. Sed fine li diris:

—Vi divenis, ke mi scivolis pri vi, sinjoro, kiam vi rimarkis mian surpriziĝon, sed, konigante vin al mi, vi ne sukcesis dispeli mian perplekson. Kontraŭe: nun, kiam mi vin konas, mi sentas eĉ pli grandan konfuzon kaj miron. Ĉu eblas nun la ekzisto de vagantaj kavaliroj en la mondo, kaj de presitaj historioj pri aŭtentaj kavaliroj? Mi ne povus kredi, ke hodiaŭ ekzistas sur la tero persono dediĉanta sin favori vidvinojn, defendi pucelojn, honori edzinojn kaj protekti orfojn, se mi ne vidus vian moŝton per miaj propraj okuloj. La ĉielo estu benata, tial, ke la rakonto de viaj noblaj kaj aŭtentaj prodaĵoj, presita laŭ viaj diroj, ĵetis en la forgeson la nekalkuleblan nombron da fikciaj kavaliroj, kies fabeloj plenigas la mondon je la damaĝo de la bonaj moroj kaj je la diskredito de la veraj historioj.

—Oni povus multe paroli pri tio, ĉu veras aŭ ne la historioj de la vagantaj kavaliroj.

—Sed, kiuj dubus, ke ili ne estas falsaj? —diris la viro en verdo.

—Mi dubas —respondis don Quijote—. Sed prefere ni lasu ĉi aferon. Se nia vojaĝo daŭros kelkan tempon, mi esperas, kun la helpo de Dio, konvinki vian moŝton, ke vi faras mave, starante je la flanko de la homoj skeptikaj pri la vero de tiaj historioj.

Kaŭze de ĉi lastaj vortoj, la vojaĝanto komencis suspekti, ke don Quijote devas iom frenezi, kaj por povi konfirmi sian suspekton, li atendis, ke la hidalgo plu eldiru siajn ideojn. Sed anstataŭe, don Quijote petis la vojaĝanton paroli pri si, en interŝanĝo por liaj informoj pri liaj vivo kaj stato. Tiam, la viro en la verda kapoto respondis:

—Mi, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno, estas hidalgo kaj naskiĝis en la vilaĝo, kie, se Dio volos, ni manĝos hodiaŭ. Mi posedas pli ol sufiĉan havon, nomiĝas don Diego de Miranda, pasas la vivon kun mia edzino, miaj filoj kaj miaj amikoj kaj ŝatas ĉasi kaj fiŝi; sed mi tenas ne falkon aŭ levrelojn, nur kvietan perdrikon logofajfan kaj furon sentiman.^[265] Mi havas proksimume ses dekojn da libroj, tiel en la hispana kiel en la latina, unuj piaj kaj la ceteraj historiaj; sed libroj kavaliraj ne pasis ankoraŭ tra la sojlo de mia pordo. Mi legas profanajn verkojn prefere al piaj, se ili havas tekston honestan, distran, stilon agrablan, kaj intrigon surprizan kaj absorban... kvankam tiaj libroj apenaŭ ekzistas en Hispanujo. Mi manĝas de tempo al tempo ĉe miaj najbaroj kaj amikoj, kaj invitas ilin ofte ĉe mi; mi regalas per bona tablo kun pladoj puraj kaj simplaj, sed abundaj; ne ŝatas klaĉojn, nek toleras, ke oni klaĉu antaŭ mi; ne ŝovas la nazon en alies vivojn, nek gvatas alies farojn; aŭskultas la

meson ĉiutage; distribuas iom el mia havo inter la paŭperaj, kaj ne paradas per miaj bonaj agoj, por ke ne ŝteliru en mian koron la hipokrito kaj la vanto, malamikoj, kiuj subtile penetras eĉ en la plej singardan animon; klopodas restarigi la pacon inter la kverelantoj; kultas Nian Sinjorinon kaj ĉiam konfidas la senliman mizerikordon de Dio, Nia Sinjoro.

Sancho atentege aŭskultis ĉi priskribon de la vivo kaj okupoj de la hidalgo en verdo; kaj juĝante tian vivon bona kaj sankta, kaj tian homon kapabla fari miraklojn, li saltis de sur la azeno, alkuris al li, kaptis lian dekstran piedingon, kaj ploreme kaj kun pia koro kisis al li la piedojn multe da fojoj. Tiam, la hidalgo en verdo demandis:

—Kion vi faras, frato? Kion signifas ĉi kisoj?

—Permesu, ke mi kisu vin —respondis Sancho—, ĉar, ŝajnas al mi, ke via moŝto estas la unua sanktulo, kiun mi vidis rajdi kun kurtaj piedingorimenoj.

—Mi estas, ne sanktulo, sed granda pekanto —diris la hidalgo en verdo—. Sed vi, frato, vi certe havas bonan koron: via naivo tion pruvas.

Sancho denove grimpis en la ŝarĝo-selon, provokinte per sia ekstravaganco la ridon de sia mastro, malgraŭ ties profunda melankolio, kaj vekinte novan miron ĉe don Diego. Tiam don Quijote demandis al la hidalgo en verdo, kiom da filoj li havas, kaj aldonis ke la antikvaj filozofoj, kvankam mankis al ili la kono pri la vera Dio, konsideris, ke la plejbono konsistas en tio, ĝui la donojn de la naturo kaj de la fortuna, kaj havi multe da amikoj kaj da bonaj filoj.

—Mi, sinjoro don Quijote —respondis la hidalgo en verdo—, havas filon, sed, se mi ne havus lin, eble mi povus konsideri min pli feliĉa ol nun. Li ne estas mava, ne, sed mi preferus lin pli bona. Li havas la aĝon de dek ok jaroj, kaj pasigis ses

en Salamanca, studante la latinan kaj la grekan. Kaj, kiam mi volis, ke li lernu aliajn sciencojn, mi trovis lin tiel absorbita en la poezia scienco (se oni povas nomi ĝin scienco), ke estis neeble igi lin alpreni la juron, kiel mi dezirus, aŭ la teologion, reĝinon de ĉiuj sciencoj. Mi volus, ke li elstaru kiel gloro de sia familio, se konsideri, ke en epoko nia, la reĝoj bele rekompencas la bonajn kaj virtajn letrojn; ĉar scio sen virto egalas al perloj en sterkejo. Li pasas la tutan tagon analizante, ĉu Homero esprimas sin bone aŭ fuŝe en unu aŭ alia verso de la Iliado; ĉu Marcial obscenas en epigramo; ĉu oni devas kompreni iel aŭ tiel certan linion de Vergilio. Verdire, liaj konversacioj temas nur pri la libroj de ĉi poetoj kaj de Horacio, Perso, Juvenalo kaj Tibulo, ĉar pri la modernaj poetoj verkantaj en nia nacia lingvo li apenaŭ atentis. Tamen, malgraŭ lia eta inklino al la hispana poezio, ĉi-momente lin plene absorbas la verkado de glosa^[266] surbaze de kvar versoj senditaj al li de Salamanca; kaj mi kredas, ke ili havas ian rilaton al literatura konkurso.

—La filoj, sinjoro —respondis don Quijote—, estas pecoj en la intima esenco de la patroj, do ni devas ami ilin bonaj aŭ mavaj, kiel ni amas la animon, kiu tenas nin vivaj. La patroj devas gvidi ilin, jam de ties infaneco, sur la pado de la virto, de la bona edukiteco, kaj de la moroj honestaj kaj kristanaj, por ke, kiam grandaj, ili estu apogiloj de siaj oldaj patroj, kaj ties glora posteularo; tamen, ne ŝajnas al mi bone devigi ilin studi unu aŭ alian sciencon, kvankam nenion oni riskas, se oni provas ilin persvadi. Kaj se iu filo ne bezonas studi por gajni sian vivopanon, ĉar feliĉe la ĉielo donis al li patron kun sufiĉa haveco pasanta al li, mi kredas, ke oni devus permesi lin studi sian preferatan objekton; kaj, kvankam la poezio pli distras ol utilas, ĝi havas nenion, kio povus ordinarie misfamigi ĝian praktikanton. Ŝajnas al mi, sinjoro hidalgo, ke la poezio similas al pucelo delikata, juna kaj belega; multaj aliaj puceloj (la aliaj sciencoj) klopodas riĉigi, poluri kaj

ornami ŝin; ŝi servigas la alian al si, kaj la aliaj devas pravigi sin per ŝi; sed ĉi pucelo ne volas esti senhonte palpata, nek elmetata al la publika scivolo, nek anoncata ĉe la anguloj de la bazaroj aŭ en la antaŭĉambroj de la palacoj; ŝi konsistas el tia kvintesenco, ke, se oni scias trakti ŝin, oni ŝin transformas en plej puran oron nekalkuleble valoran; ŝia posedanto devas teni ŝin inter certaj limoj kaj ne lasi ŝin devii al malicaj satiroj aŭ fiaj sonetoj; oni neniam devas vendi ŝin, krom se ŝi aperas en la formo de heroaj epopeoj, kortuŝaj tragedioj aŭ gajaj kaj spritaj komedioj; ŝin traktu nek la friponoj, nek la senscia plebo, nekapabla kompreni aŭ aprezi ŝian valoron. Kaj ne pensu, sinjoro, ke mi opinias plebo nur la popolon vulgaran kaj basan; vere, ajna persono sen scio, eĉ se li havas moŝtan aŭ princan rangon, povas kaj devas konsideri sin membro de tia plebo. Tiel do, la persono, kiu kun la menciitaj kvalitoj traktos kaj uzos la poezion, famiĝos en la civilizitaj regnoj de la tuta mondo, kaj lia nomo estos ĉie laŭdata. Kaj pri via aserto, sinjoro, ke via filo ne tre aprezas la poezion en nia nacia lingvo, mi pensas, ke li ne pravas ĉi-rilate, kaj jen la kialo: la granda Homero, ĉar greko, ne verkis en la latina, kaj Vergilio, ĉar latino, ne verkis en la greka. Unuvorte, la antikvaj poetoj skribis en la lingvo, kiun ili suĉis kun la patrina lakto, kaj ne iris serĉi fremdan idiomon por esprimi la noblon de siaj konceptoj; se tiel do, estus ĝuste, se ĉi kutimo disvastiĝus ĉie, kaj se oni ne disdegnus, por ekzemplo, germanan poeton, ĉar li versas en sia lingvo, aŭ kastilian, aŭ eĉ vaskan, ĉar ili verkas en la sia. Sed, ŝajnas al mi, sinjoro, ke via filo sentas disdegnon, ne al nacia poezio, sed al la naciaj poetoj, kiuj havas nenian konon pri aliaj lingvoj kaj sciencoj, kaj ne povas do garni, vekaj kaj helpi per ili sian naturan inspiron. Sed eble ankaŭ ĉi-rilate ekzistas eraro, ĉar, laŭ ĝusta opinio, oni naskiĝas poeto, t. e. la natura poeto elvenas jam poeto en la ventro de sia patrino, kaj kun nur ĉi impulso donacita de la ĉielo, kaj sen bezono de poetikaj studoj, li komponas verkojn, kies

enhavo pruvas la veron de la diro: *est Deus in nobis*,^[267] ktp. Mi diru ankaŭ, ke la natura poeto tre superas, helpante al si per la studo, la poeton kun nur scio de la poezia tekniko. La motivo kompreneblas: la arto ne superas la naturon, nur ĝin perfektigas. Sekve, la naturo kombinita kun la arto, kaj la arto kombinita kun la naturo, povas krei perfektegan poeton. Resume de miaj vortoj, mi aldonu, sinjoro hidalgo, ke via moŝto lasu vian filon iri, kien lia stelo lin vokas, ĉar se li estas bona studento, kion certe li estas, kaj se li sukcese atingis la unuan ŝtupon de la sciencoj, nome, la posedon de lingvoj, li ascendas per si mem ĝis la pinto de la homaj letroj, tre propraj al kavaliro bonstata, kaj tiel ornataj, honoraj kaj prestiĝaj al li, kiel mitro al episkopo, aŭ kiel talaro al juĝisto. Via moŝto admonu vian filon, se li skribus satirojn damaĝajn al alies honoro: punu lin kaj disŝiru ilin; sed, se li verkus pecojn laŭ la stilo de Horacio, kie li ĝenerale kritikus la fivivon tiel elegante kiel la latina poeto, laŭdu lin: ĉar licas versi kontraŭ la envio kaj la enviuloj, kaj same kontraŭ la ceteraj fiinklinoj, se nur la poeto mencias nenies nomon, kvankam akzistas poetoj kapablaj elmeti sin al la risko suferi ekzilon en la insuloj de Ponto-Eŭksino por la plezuro eldiri malicaĵojn. Se la poeto ĉastas, ankaŭ liaj versoj ĉastos; la plumo estas la lingvo de la animo, kaj, kio fontas el la animo de la poeto, tion respegulas liaj verkoj; tiel do, kiam reĝoj kaj princoj vidas la mirindan arton poezian en ĉi homoj prudentaj, virtaj kaj seriozaj, ili ilin honoras, estimas kaj riĉigas, kaj eĉ kronas ilin per folioj de la arbo respektata de la fulmoj,^[268] kvazau indikante, ke la homoj, kies frunton honoras kaj ornamas tiaj kronoj, devas ricevi nenies ofendon.

La hidalgo en la verda kapoto miris je la rezonoj de don Quijote, tiele, ke li komencis modifi sian antaŭan opinion pri lia frenezo. Sed, meze de ĉi konversacio, kies temo ne tre plaĉis al Sancho, la ŝildisto deviis de la vojo por peti iom da lakto de kelkaj paŝtistoj, kiuj tie proksime melkis ŝafinojn.

Kaj ĝuste kiam don Diego, tre kontenta je la saĝo kaj elokvento de don Quijote, pretis respondi lin, ĉi lasta levis la kapon kaj vidis veni, sur la sama vojo kie ili iris, ĉaron ornamitan per multe da reĝaj flagoj; kaj kredante, ke li frontas ian novan aventuron, li krie vokis la ŝildiston, ke li alportu al li la helmon. Sancho, aŭdante, ke oni lin vokas, disiĝis de la paŝtistoj kaj urĝis la azenon ale al sia mastro, kiu tuj poste sin implikis en absurdan kaj teruran aventuron.

[264] Versoj el olda romanco.

[265] Enkaĝa virperdriko altiris per siaj fajfoj aliajn perdrikojn al reto aŭ al alispeca kaptilo. La dresita falko atakis rekte diversajn birdegojn dum la flugo. Oni uzis, krom hundoj, ankaŭ furojn por la ĉaso de kunikloj kaj leporoj.

[266] Ĉi tie, «gloso» signifas ripeti, ĉe la fino de ĉiu strofo, unu aŭ pli da versoj prenitaj el alia poeziaĵo. En la ĉapitro 18-a de la dua parto troviĝas ĉi-speca gloso.

[267] Latinaĵo: «Dio troviĝas inter ni». Frazo aperanta en diversaj verkoj de Ovidio.

[268] La laŭro.

Ĉapitro 17

Kie oni legas pri la plej alta kaj ekstrema punkto atingita de la senegala kuraĝo de don Quijote kaj ankaŭ pri la feliĉa fino de la aventuro de la leonoj

Nia historio rakontas, ke, kiam don Quijote kriis al Sancho, ke li alportu lian helmon, la ŝildisto estis aĉetanta de la paŝtistoj kelke da kazeaj fromaĝoj, kaj, nervoza pro la urĝigaj voĉoj de sia mastro, li ne sciis kion fari kun ili, nek kien meti ilin; sed, por ke ili ne perdiĝu, ĉar jam pagitaj, li decidis ilin enĵeti en la helmon de sia mastro, kaj kun ĉi bela ŝarĝo turnis sin por vidi kion don Quijote volas, proksimiĝis kaj aŭdis lin diri:

—Amiko, donu al mi la helmon, ĉar, aŭ mi apenaŭ scias pri aventuroj, aŭ kio vidiĝas tie estas unu el ili, kaj tia, ke ĝi devigos min, pli ĝuste, devigas min preni la armilojn.

Ĉe tiaj vortoj, la hidalgo en la verda kapoto rigardis ĉien, sed nur videblis ĉaro alproksimiĝanta, garnita per du tri etaj flagoj, kio igis lin pensi, ke ĝis portas monon de lia majesta moŝto; li diris sian opinion al don Quijote, sed ĉi lasta tute ne atentis lin, kaj, ĉiam kredante kaj imagante, ke ĉio okazonta al li devas konsisti nur el aventuroj super aventuroj, respondis al la viro en verdo:

—Homo preparita, preskaŭ venkinta. Nenion oni perdas, prenante antaŭ-zorgojn; mi scias per propra sperto, ke mi havas malamikojn videblajn kaj nevideblajn, sed ne scias, kiam, kie aŭ en kia figuro ili atakos min.

Kaj, turnante sin al Sancho, don Quijote petis de li la helmon; la ŝildisto, kiu ne havis okazon elpreni la kazeajn

fromaĝojn, devis redoni la helmon, kia ĝi estis. Don Quijote ĝin kaptis kaj, sen atenti ĝian enhavon, rapide entiris ĝin sur sian kapon. Tiam la kazeaĵoj kunpremiĝis, fandiĝis, kaj la selakto komencis disflui sur la vizaĝo kaj la barbo de don Quijote, tiel alarmante lin, ke li kriis al la ŝildisto:

—Kio okazas, Sancho? Aŭ mia kranio moliĝas, aŭ la cerbo fandiĝas al mi, aŭ mi ŝvitas de la kapo ĝis la piedoj. Kaj, se mi ŝvitas, mi ja ne ŝvitas de timo, kvankam mi kredas, ke sendube mi alfrontos tuj teruran aventuron. Donu al mi, se vi havas, ion por viŝi min, ĉar ĉi densa ŝvito blindigas al mi la okulojn.

Sancho, sen respondi, donis al li tukon kaj samtempe dankis en si al Dio, ke lia mastro ne divenis la veron. Don Quijote viŝis sin, demetis la helmon por vidi, ĉu io tie kulpas la fridiĝon de lia kapo, kaj rimarkante specon de blanka kaĉo en la helmo, levis ĝin al sia nazo, alflaris kaj diris:

—Je la vivo de mia sinjorino Dulcinea de El Toboso, kazean fromaĝon vi metis ĉi tien, perfida, fripona kaj senkonsidera ŝildisto!

Sancho respondis al tio kun granda flegmo kaj hipokrito:

—Se temas pri kazeaĵo, donu ĝin, ke mi ĝin manĝu; sed prefere la diablo ĝin englutu, ĉar certe li metis ĝin en la helmon. Ĉu mi kuraĝus makuli la helmon de via moŝto? Facile koneblas la kulpulo! Mi ĵuras je Dio, sinjoro, ke, kiom mi komprenas, la sorĉistoj persekutas ankaŭ min, kiel parton kaj membron de via moŝto, kaj sendube metis ĉi naŭzaĵon en la helmon por ŝanĝi vian paciencon en koleron kaj por ke vi, kiel kutime, pistu al mi la ripojn. Sed ĉi-foje la sorĉistoj vere mistrafis: mi konfidis la prudenton de mia sinjoro kaj tion, ke li certe konsideris, ke mi portas nun mi nek kazeaĵon, nek lakton, nek ion similan; kaj ke, se mi ĝin

havirus, mi metus ĝin, ne en la helmon, sed prefere en mian stomakon.

—Povas esti —respondis don Quijote.

Dume la hidalgo en verdo ĉion rigardis kaj je ĉio miris, ĉefe kiam don Quijote, viŝinte sian kapon, vizaĝon kaj barbon, kaj poste la helmon, surmetis ĉi lastan kaj, firme sur la piedingoj, provis la uzeblecon de la glavo per ektiro en la ingo, prenis la lancon, kaj diris:

—Nun, venu io ajn: mi pretas alfronti eĉ Satanon en persono.

Ĉe tio alvenis la ĉaro de la flagoj, kie vidiĝis nur la ĉaristo sur unu el la muloj, kaj alia viro sidanta ĉe la antaŭo de la veturilo. Don Quijote baris al ĝi la vojon kaj demandis:

—Kien vi iras, fratoj? Kion vi havas en la ĉaro, kaj kion signifas la flagoj?

—La ĉaro apartenas al mi —respondis la surmululo— kaj transportas en kaĝoj du sovaĝajn leonojn. La generalo de Orán sendas ilin al Madrid, kiel donacon al Lia Majesto. La flagoj, de nia sinjoro la reĝo, indikas, ke ĉio en la ĉaro estas lia.

—Ĉu la leonoj grandas? —demandis don Quijote.

—Tiom —respondis la viro en la ĉaro—, ke neniam antaŭe pasis de Afriko al Hispanujo leonoj pli grandaj, aŭ tiel grandaj. Mi, kiel leonisto, jam transportis aliajn, sed ne kompareblajn al ĉi leonoj. Temas pri geparo: la masklo sidas en ĉi fronta kaĝo, la femalo en la posta, kaj la du tre malsatas, ĉar ili ankoraŭ ne manĝis hodiaŭ. Bonvolu do, sinjoro, lasi min iri survoje: ni devas rapidi por alveni baldaŭ al loko, kie ni povos doni al ili manĝon.

lom ridetante, don Quijote respondis:

—Leonetoj al mi? Leonetoj al mi, kaj ĉi-hore? Nu, mi ĵuras je Dio, ke la sendintoj de ĉi animaloj scios, ĉu mi estas viro kapabla timiĝi de leonoj. Desaltu, amiko, kaj tial, ke vi estas la gardisto, apertu la kaĝon kaj elpelu la leonojn, ĉar meze de ĉi kamparo mi montros, kia estos don Quijote de La Mancha, spite al la sorĉistoj, kiuj sendis ilin al mi.

—Haha! —tiam diris en si la hidalgo en verdo—. Nia bona kavaliro rivelas nun sian veran naturon; sendube la kazeaĵoj moligis lian kranion kaj turnis lian cerbon en akvon.

Tiam, Sancho proksimiĝis al li kaj diris:

—Sinjoro, je Dio, bonvolu interveni, ke mia mastro don Quijote ne batalu kontraŭ la leonoj, ĉar, alie, ili ŝiros nin senescepte en pecojn.

—Ĉu via mastro frenezas ĝis la ekstremo, ke vi timas kaj kredas, ke li batalos kontraŭ tiel sovaĝaj bestoj?

—Li estas, ne freneza, sed temerara —respondis Sancho.

—Mi persvados lin ne temerari.

La viro en verdo proksimiĝis al don Quijote, kiu urĝadis la gardiston aperti la kaĝojn, kaj diris:

—Sinjoro, vaganta kavaliro devus interveni en aventuroj, se ili prezentas ian eblon de sukceso, sed ne, se ili montriĝas absolute seneliraj: ĉar la kuraĝa turniĝanta en temeraran ŝajnas pli freneza ol sentima. Des pli, ke ĉi leonoj havas nenion kontraŭ vi, eĉ ne en sia penso; krome, ili estas donacoj faritaj al Lia Majesto, kaj ne konvenas deteni ilin aŭ interrompi ilian vojaĝon.

—Bonvolu via moŝto, sinjoro hidalgo —respondis don Quijote — iri al via perdriko logofajfa kaj al via furo sentima, kaj lasu, ke ĉiu homo faru sian taskon. Mi faras nun la mian, kaj ne scias, ĉu ĉi sinjoroj leonoj venos, aŭ ne, kontraŭ mi.

Poste, li turnis sin al la gardisto kaj diris:

—Mi ĵuras, sinjoro fripono, ke se vi ne apertas tuj la kaĝojn, per ĉi lanco mi alpikos vin al la ĉaro.

La ĉaristo, vidante la deciditecon de la armita fantomo, respondis:

—Sinjoro, bonvolu pro karitato lasi min eljungi la mulojn kaj savi min kun ili, antaŭ ol elsaltos la leonoj, ĉar, se ĉi lastaj mortigus al mi la brutojn, mi ruiniĝus por la cetero de mia vivo. Mi posedas nenian havon, krom la ĉaro kaj la muloj.

—Ho vi, homo de eta fido! —respondis don Quijote—. Descendu, eljingu kaj faru laŭvole: baldaŭ vi vidos, ke vi vane laboris, kaj ke vi povis ŝpari al vi ĉi penon.

La ĉaristo sobiris kaj eljungis tre rapide, dum la leonisto kriis:

—La personoj ĉi tie atestu, ke mi apertas la kaĝojn kaj liberigas la leonojn devigite kaj kontraŭvole, kaj ke mi informas al ĉi sinjoro, ke ĉian difekton kaj damaĝon kaŭzotan de la leonoj, plus miaj salajro kaj impostoj oni debetos en lian konton. Viaj moŝtoj, sinjoroj, jam iru al pli sekura loko, ĉar, rilate al mi, mi certas, ke la leonoj ne turnos sin kontraŭ min.

La hidalgo en verdo petis denove la kavaliron rezigni tian frenezaĵon, kaj aldonis, ke entrepreni tiel grandan absurdon egalus defii la providencon. Don Quijote respondis, ke li

scias kion li faras, kaj la alia insistis, dirante, ke li bone konsideru la aferon kaj ne trompiĝu.

—Nun, sinjoro —respondis don Quijote—, se vi ne volas ĉeesti tion, kio, laŭ via opinio, finiĝos tragedie, spronu vian ĉevalinon kaj prenu vin el la danĝero.

Aŭdinte tion, Sancho, kun larmoplenaj okuloj, petegis sian mastron rezigni ĉi aventuron, ĉar, kompare kun ĝi, la aventuro de la ventomuelejoj, la terura travivaĵo ĉe la fulmarteloj, kaj unuvorte, la tuto de la faroj de li plenumitaj en lia vivo, egalas al kisoj kaj karesoj.

—Atentu, sinjoro, —aldonis Sancho—, ke nenia ensorĉo ekzistas ĉi tie: inter la stangoj kaj tra la fendoj de la kaĝo mi vidis ungon de vera leono, kaj, se juĝi el tia ungo, la leono grandas pli ol montego.

—La timo —respondis don Quijote— igas vin vidi la ungon pli granda ol, almenaŭ, la duono de la mondo. Retiru vin kaj lasu min sola; kaj se mi mortos ĉi tie, jam vi scias nian oldan interkonsenton: vi iros al Dulcinea... kaj ne necesas, ke mi diru ion plian.

Li aldiris kelke da vortoj, kaj ili tute forigis de la ĉeestantoj la esperon, ke li fine rezignus sian frenezan projekton. La viro en la verda kapoto havis la ideon oponi al li; sed li vidis sin ne tiel bone armita, kaj krome pensis, ke li kondukus stulte disputante kun sencerbulo tiel plene freneza, kiel al li jam ŝajnis don Quijote. La kavaliro denove minacis kaj urĝis la leoniston aperti, kaj ĉe tio la hidalgo en verdo spronis la ĉevalinon, Sancho la azenon, la ĉaristo la mulojn, kaj ĉiuj klopodis distanciĝi kiel eble plej rapide de la ĉaro, antaŭ ol la leonoj elsaltus el la kaĝoj. Sancho jam priploris la morton de sia mastro, ĉar li ne dubis, ke ĉi-foje don Quijote pereos sub la ungoj de la leonoj. Li malbenis sian sorton kaj nomis

fatala la horon, kiam li havis la ideon servi lin denove; sed, malgraŭ siaj ploroj kaj lamentoj, li ne forgesis frapi la azenon, por ke ĝi distanciĝu pli kaj pli de la ĉaro.

Kiam la leonisto vidis, ke la fuĝantoj jam troviĝas sufiĉe for, li ripetis siajn petojn kaj avertojn al don Quijote. Sed la kavaliro respondis, ke li jam aŭskultis ilin, ke li ne atentis pli da avertoj kaj petoj, ĉar ili donos nenian frukton, kaj ke oni ne plu perdu la tempon.

Dum la leonisto preparis sin por aperti la unuan kaĝon, don Quijote konsideris, ĉu li devus batali piede aŭ rajde, kaj fine, decidis batali piede, ĉar li timis, ke Rocinante teruriĝus, vidante la leonojn. Li saltis do de sur la ĉevalo, forĵetis la lancon, fiksas la ŝildon al la brako, elingis la glavon, kaj paŝon post paŝo, kun mirinda aŭdaco kaj kuraĝa koro iris ĝis antaŭ la ĉaro kaj haltis tie, rekomendante sin al Dio kaj al sia sinjorino Dulcinea.

Kaj oni notu ĉi tie, ke, kiam la aŭtoro de ĉi vera historio alvenis al ĉi epizodo, li ekkriis kaj diris: «Ho, brava kaj nekomporeble kuraĝa don Quijote de La Mancha, spegulo, kie povas rigardi sin la kuraĝaj viroj de la mondo! Ho, dua kaj nova don Manuel de León, honoro kaj gloro de la hispanaj kavaliroj! Per kiaj vortoj mi rakontus ĉi teruran faron, aŭ per kiaj rezonoj mi igus ĝin kredebla al la futuraj epokoj? Kiaj laŭdoj povus respondi al via merito, eĉ se ili estus hiperboloj superaj al ĉiuj hiperboloj? Vi piede, vi sola, vi aŭdaca, vi grandanima, vi kun nur unu simpla glavo, ne el la famaj kaj tranĉaj de Toledo, kaj kun unu ŝildo el ne tre brila kaj pura ŝtalo, atendas la du plej sovaĝajn leonojn iam kreskintajn en la afrikaj savanoj. Viaj propraj heroaĵoj faru vian panegiron, kuraĝa manĉano, do, manke de vortoj por ilin laŭdi, mi prezentas ilin en ties tuta gloro».

Ĉi tie la aŭtoro finas sian eksklamacion kaj reprenas la fadenon de ĉi historio, dirante:

Kiam la leonisto vidis la hidalgon firma en sia sinteno, kaj komprenis, ke se li ne liberigus la leonon li altirus al si la danĝeran sekvon de la indigno de la kuraĝa kavaliro, li plene apertis la unuan kaĝon, kie, kiel jam dirite, troviĝis la virleono, kiu impresis pro sia eksterordinara granda kaj pro sia terura kaj minaca aspekto. Unue la besto ruliĝis en la kaĝo, eltiris la ungojn kaj sin streĉis en sia tuta longo; poste apertis la buŝon, oscedis longe, kaj, elpuŝinte preskaŭ du spanojn da lango, forlekis per ĝi la polvon el siaj okuloj kaj lavis al si la vizaĝon. Tion farinte, la leono elmetis la kapon el la kaĝo kaj rigardis ĉien kun okuloj ardaĵ kiel braĝoj: pozo kaj rigardo kapablaj teruri la temerarecon mem. Nur don Quijote observis atente la beston, dezirante, ke ĝi elsaltu el la ĉaro kaj venu en la atingo de liaj manoj, ĉar li havis la intencon dishaki ĝin en pecojn. Ĝis tia ekstremo lin puŝis lia neimagebla frenezo. Sed la nobla leono, pli sindetena ol aroganta, ne atendis ĉi infanan fanfaronajon, kaj, rigardinte al unu kaj al la alia flanko, kiel dirite, turnis la dorson, montris sian pugon al don Quijote kaj plej flegme kaj trankvile kuŝiĝis denove en la kaĝo. Ĉe tio don Quijote ordonis la leoniston frapi la beston, ke ĝi koleriĝu kaj eliru.

—Tion mi ne faros —respondis la leonisto— ĉar, se mi ĝin incitus, ĝi dispecigus min, la unuan. Via moŝto, sinjoro kavaliro, kontentiĝu per via ĵusa faro nesupereble kuraĝa, kaj ne defiu duafoje la sorton. La leono havas la pordon aperta, kaj povas decidi laŭvole, ĉu eliri, ĉu ne, sed, ĉar ĝi ne eliris ĝis nun, ĝi ne eliros en la tuta tago. La granda de via kuraĝo jam bone pruviĝis. Laŭ mia kompreno, neniu ĉampiono devas fari pli ol defii la malamikon kaj atendi lin en la batal-kampo. Se lia oponento ne aperas, la infamio falas sur lin, kaj la defianto ricevas la honoron de la triumfo.

—Vi pravas —respondis don Quijote—. Fermu do la pordon, amiko, kaj atestu, kiom vi plej bone povas, ke ĉi tie okazis la jeno: vi apertis al la leono, mi atendis, la besto ne eliris, mi denove atendis, la leono ne volis ankoraŭ eliri kaj denove kuŝiĝis. Mi faris mian devon, ensorĉoj ne intervenu, kaj Dio helpu la juston, la veron kaj la aŭtentan kavalirismon. Fermu la pordon, mi ripetas, kaj dume mi signos al la forkurintoj, ke ili revenu kaj sciu de via buŝo ĉi faron.

La leonisto obeis, kaj don Quijote, fiksinte al la pinto de la lanco la tukon, per kiu li antaŭe forviŝis de sia vizaĝo la inundon de selakto, komencis laŭte voki al la aliaj, kiuj, en grupo pelata de la hidalgo en verdo, forkuris ankoraŭ kaj ĉiumomente turnis la kapon; sed Sancho atingis vidi la blankatukan signalon kaj diris:

—La diablo min prenu, se mia sinjoro ne venkis la sovaĝajn bestojn, ĉar li vokas nin.

Ĉiuj bridis, observis, ke don Quijote faras signojn al ili, kaj, perdante iom de sia timo, ili proksimiĝis iom post iom, ĝis ili povis aŭdi la voĉojn de don Quijote. Fine ili alvenis al la ĉaro, kaj tiam don Quijote diris al la ĉaristo:

—Frato, rejangu viajn mulojn kaj daŭrigu la vojaĝon; kaj vi, Sancho, donu unu or-eskudon al li kaj alian al la leonisto, rekompence por la tempo, kiun ili perdis pro mi.

—Tre volonte mi donos ilin —respondis Sancho—. Sed, kio okazis al la leonoj? Ĉu ili vivas ankoraŭ aŭ mortis?

Tiam la leonisto rakontis detale kaj vort-abunde la finon de la batalo, troigante, kiom plej bone li sciis kaj povis, la kuraĝon de don Quijote, ĉe kies vido la leono, timigite, nek volis, nek aŭdacis eliri el la kaĝo, kvankam ties pordo teniĝis aperta longan tempon; li aldonis, ke li diris al don Quijote, ke kolerigi la leonon por igi ĝin eliri, kiel la kavaliro deziris,

egalus defii la providencon, kaj ke, fine, malgraŭvole kaj nevolonte, li permesis al la leonisto fermi la pordon.

—Kion vi opinias pri tio, Sancho? —demandis don Quijote—. Ĉu ekzistas ensorĉoj kapablaj elteni kontraŭ la vera kuraĝo? La sorĉistoj povas preni de mi la fortunon, sed absolute ne la energion kaj firmecon de la animo.

Sancho donis la eskudojn, la ĉaristo rejungis la mulojn, la leonisto kisis la manon de don Quijote por la donaco ricevita, kaj promesis rakonti lian kuraĝan faron eĉ al la reĝo mem, se li vidus lin en la kortego.

—Se okaze lia majesta moŝto demandos al vi, kiu do plenumis la faron, diru, ke la Kavaliro de la Leonoj, ĉar mi volas, ke mia ĝisnuna alnomo la Kavaliro de la Trista Mieno estu jam ŝanĝita, transformita kaj modifita en la alian: kaj ĉirilate mi sekvas la antikvan kutimon de la vagantaj kavaliroj, kiuj ŝanĝis al si la nomon, kiam ili volis, aŭ kiam prezentiĝis konvena okazo.

La ĉaro daŭrigis sian vojaĝon, kaj don Quijote, Sancho kaj la hidalgo en la verda kapoto la sian. Dumtempe don Diego de Miranda observis kaj aŭskultis tiel atente la farojn kaj la esprimojn de don Quijote, ke li diris eĉ nu unu vorton, kaj pensis, ke la kavaliro estas saĝa frenezulo, aŭ homo freneza ĉe la rando de la saĝo. Don Diego ne konis ankoraŭ la unuan parton de lia historio; ĉar, se li estus ĝin leginta, li ne mirus je liaj faroj kaj diroj, tial, ke li konus la naturon de lia frenezo. Sed, en sia senscio, li kelkfoje prenis lin por saĝa, kelkfoje por freneza, se konsideri, ke la diroj de don Quijote montriĝis koheraj, elegantaj kaj bone esprimitaj, kaj liaj faroj ekstravagancaj, absurdaj kaj temeraj. Kaj la viro en verdo diris en si:

—Ĉu ekzistas pli granda frenezo ol tio, ke li surmetis helmon plenan de kazeaj fromaĝoj, kaj pensis, ke la sorĉistoj moligis lian kranion? Kaj, kio pli absurda kaj temerara ol insisti nepre batali kontraŭ la leonoj?

Sed don Quijote eltiris lin el ĉi pensoj kaj el ĉi monologo, dirante:

—Sendube, sinjoro don Diego de Miranda, via moŝto konsideras min absurda kaj freneza. Kaj ne strange, ĉar miaj faroj atestas nenion alian. Tamen, mi deziras, ke via moŝto sciu, ke mi estas nek tiel freneza, nek tiel absurda, kiel certe mi ŝajnas al vi. Bele aspektas brava kavaliro antaŭ la okuloj de la reĝo, kiam, meze de la areno, li sukcese lancas sovaĝan taŭron; bele aspektas kavaliro en brila armaĵo, kiam li galopas antaŭ la damoj en gajaj turniroj, kaj bele aspektas la kavaliroj, kiuj en militaj, aŭ en ŝajne militaj, ekzercoj, distras, amuzas kaj iasence honoras la kortegon de siaj suverenoj; sed pli bele ol la menciitaj kavaliroj aspektas la vaganta tra dezertoj, solejoj, apartaj padoj, arbaroj kaj montoj, kiam li serĉas aventurojn, celante meti al ili sukcesan kaj feliĉan finon nur por gajni daŭran kaj gloran renomon. Pli bele aspektas, mi ripetas, kavaliro, kiu helpas vidvinon en iu sovaĝa loko, ol kavaliro kortega, kiu amindumas pucelon en la urbo. Ĉiu kavaliro havas sian apartan funkcion: la kortega do servu la damojn, ornamu per siaj kostumoj la palacon de la reĝo, helpu al kavaliroj senhavaj per la riĉaj pladoj de sia tablo, organizu konkur-batalojn, aranĝu turnirojn, montru sin grand-anima, donacema, pompa kaj ĉefe bona kristano, kaj li plenumos tiel sian difinitan devon. Sed la vaganta serĉu la forojn de la mondo, penetru en la plej implikajn labirintojn, ataku ĉiupaŝe tion neeblan, eltenu en la dezertaj stepoj la ardan sunon meze de la somero, kaj la senkompatan rigoron de la vento kaj la frostoj en la vintro, sen esti alarmita ĉe leonoj, nek terurita ĉe fantomoj, nek timigita ĉe drakoj, ĉar ili serĉi,

ataki kaj venki estas lia ĉefa kaj vera funkcio. Kaj tial, ke mi havas la fortunon aparteni al la vaganta kavalirismo, mi ne povas ne entrepreni tion, kio, laŭ mia opinio, troviĝas inter la limoj de mia devo; tiel do, kiam mi ĵus atakis la leonojn, mi agis laŭdeve, kvankam, mi konfesas, kun troa temerareco, ĉar mi bone scias, ke la kuraĝo estas virto inter du mavaj ekstremoj: timemo kaj temeraro. Tamen, se la kuraĝa leviĝas al la nivelo de la temerara, malpli riproĉindas, ol se li descendas kaj falas en la abismon de la poltrona. Same kiel pli facilas al la prodiga descendi al la nivelo de la donacemo, ol al la avara ascendi al ĝi, same tiel pli facilas al la temerara veni ĝis la vera kuraĝo, ol al la poltrona proksimiĝi al ĝi. Kaj, rilate al ĉi afero de la aventuroj, kredu min, sinjoro don Diego, ke preferindas perdi pro troa ludkarto ol pro maltroa, ĉar sonas pli agrable en la orelo de aŭskultanto «Tia kavaliro estas temerara kaj kuraĝa» ol «Tia kavaliro estas timema kaj poltrona».

—Mi diras, sinjoro don Quijote —respondis don Diego—, ke ĉio, kion via moŝto faris kaj diris, kongruas kun la postuloj de la racio mem, kaj mi kredas, ke, se la leĝoj kaj reguloj de la vaganta kavalirismo perdiĝus, oni ilin retrovus en via propra koro, kvazaŭ en ilia propra kaj natura arĥivo. Sed estas iom tarde, do ni rapidu al miaj vilaĝo kaj domo; tie via moŝto ripozos de via pasinta laboro, kiu sendube kaŭzis al vi, se ne korpan, almenaŭ spiritan lacon, kaj ĉi lasta ofte provokas la lacon de la korpo.

—Mi akceptas vian inviton kiel grandan favoron kaj honoron, sinjoro don Diego —respondis don Quijote.

Kaj spronante iom pli insiste ol antaŭe, ili alvenis ĉirkaŭ la dua horo posttagmeze al la vilaĝo kaj al la domo de don Diego, kiun don Quijote alnomis la Kavaliro en la Verda Kapoto.

Ĉapitro 18

Pri tio, kio okazis al don Quijote en la kastelo aŭ domo de la Kavaliro de la Verda Kapoto, kaj pri aliaj kuriozaj aferoj

Don Quijote trovis la domon de don Diego de Miranda vasta, kia ordinare estas la vilaĝaj domoj. Lia blazono, el ŝtono krude ĉizita, vidiĝis super la strato-pordo; la vin-kelo situis en la korto, la provizejo ĉe la portalo, kaj ie tie staris dise multaj ĵaroj, kiuj, ĉar faritaj en El Toboso, igis la kavaliron rememori pli vive sian ensorĉitan kaj metamorfozitan Dulcinea. Kaj sen atenti kion li diras, aŭ antaŭ kies ĉeesto li parolas, li deklamis suspirante:

Ho dolĉaj pensoj, vundaj nun al koro,
tenere dolĉaj kiam volis Dio^[269]

Kaj li daŭrigis:

—Ho ĵaroj de El Toboso: vi vekis en mia memoro la dolĉan penson, al mi plej amaran!

Tion aŭdis la studento-poeto, filo de don Diego, elirinta kun sia patrino akcepti lin, kaj ambaŭ miris je la stranga figuro de don Quijote, kiu deseliĝis de Rocinante kaj tre ĝentile petis de la sinjorino ties manon por ĝin kisi. Tiam don Diego diris:

—Akceptu, sinjorino, kun via kutima afablo, ĉi sinjoron don Quijote de La Mancha, la plej kuraĝa kaj saĝa kavaliro vaganta de la mondo.

La sinjorino, nomata doña Cristina, bonvenigis lin per elmontroj de granda simpatio kaj ĝentilo, kaj don Quijote salutis ŝin per abundo de diskretaj kaj agrablaj vortoj. Preskaŭ la samajn komplimentojn li faris al la studento kaj, aŭdante lin paroli, juĝis lin saĝa kaj inteligenta.

Ĉi tie la aŭtoro de ĉi historio detale priskribas la domon de don Diego, pentrante al ni la enhavon de la hejmo de riĉa hidalgo vilaĝa; sed la tradukisto preferis pasi en silento super ĉi tiaj kaj similaj bagateloj, ĉar ili ne bone kongruas kun la ĉefa objekto de la rakonto, kies forto baziĝas sur la vero pli ol sur tedaj digresioj.^[270]

Oni kondukis la kavaliron en ĉambron, kie Sancho demetis lian armaĵon kaj lasis lin en ties valona kalsono kaj ĉamoleda saĵo tute grasecaj pro ilia frotado kun la pecoj de la armaĵo. Poste don Quijote surmetis al si Van-Dajkan kolumon ne amelitan kaj senpuntan, laŭ la maniero de la studentoj, paron da flavaj subŝuoj kaj alian paron da ŝuoj ciritaj, garnis sin per sia bona glavo pendantsanta de balteo el foka ledo (laŭdire li suferis dum multaj jaroj renan afekcion)^[271] kaj fine surŝultrigis al si senkapuĉan mantelon el bona drapo. Sed unue li lavis al si la vizaĝon kaj la kapon, uzante la akvon de kvin aŭ ses siteloj (ekzistas diferenco de opinioj pri la ĝusta nombro) sen ke la akvo perdis sian selaktan koloron, originantan el la frandemo de Sancho kaj el ties aĉeto de la misŝancaj kazeaĵoj, kiuj tiel blankigis lian mastron. Tiel vestita, kaj kun ĝentila kaj senĝena mieno, don Quijote pasis en alian ĉambron, kie la studento atendis lin por babilu kun li, dum oni primetis la tablon, ĉar, ĉe la alveno de tiel nobela gasto, sinjorino doña Cristina volis montri, ke ŝi povas kaj scias regali ĉian vizitanton. Pli frue, kiam don Quijote demetis la armaĵon, don Lorenzo (tiel nomiĝis la filo de don Diego) havis la okazon demandi al sia patro:

—Kion diri pri ĉi kavaliro, kiun via moŝto prenis hejmen? Lia nomo, lia figuro, kaj lia aserto, ke li estas vaganta kavaliro, perpleksigas min kaj mian patrinon.

—Mi ne scias kion respondi, filo. Nur, ke mi vidis lin konduiti kiel la plej granda frenezulo de ĉi mondo, kaj samtempe paroli tiel saĝe, ke liaj rezonoj forgesigas kaj nuligas liajn farojn; parolu al li kaj palpu la pulson de lia scio kaj, ĉar vi estas inteligenta, juĝu laŭ via propra kriterio, ĉu li frenezas aŭ ne, kvankam, se diri la veron, mi kredas, ke li havas en la kapo pli da frenezo ol da saĝo.

Ĉe tio don Lorenzo iris babili kun don Quijote, kiel dirite, kaj la kavaliro diris al li:

—La patro de via moŝto, sinjoro don Diego de Miranda, sciigis min pri via rara talento kaj subtila spirito, kaj ĉefe, ke vi estas granda poeto.

—Poeto, eble —respondis don Lorenzo—, sed granda, tute ne. Verdire, mi inklinas al la poezio kaj al la legado de bonaj poetoj; sed tio ne sufiĉas, por ke oni nomu min granda, kiel mia patro faras.

—Via modesto plaĉas al mi —diris don Quijote—, ĉar ĝenerale la poetoj arogantas kaj rigardas sin la plej grandaj de la mondo.

—Ne ekzistas regulo sen esceptoj —respondis don Lorenzo—. Eble troviĝas poetoj vere grandaj kaj tamen ne konsideras sin tiaj.

—Ne multaj —diris don Quijote—. Sed, super kiaj versoj laboras nun via moŝto? Via sinjoro patro sciigis al mi, ke kaŭze de ili vi nervozas kaj faras al vi zorgojn. Se temas pri glosado, mi iom kompetentas pri tia arto, kaj tre ŝatus aŭdi la versojn. Se vi destinas ilin al literatura konkurso, klopodu

ricevi la duan premion, ĉar la unuan ĉiam oni donas konsiderante la influon aŭ la rangon; la vera merito ricevas la duan, do la trian oni devas konsideri la dua, kaj, laŭ ĉi kalkulo, la unua devus stari trialoke, same kiel okazas en la universitatoj, kiam oni atribuas la licenciojn. Malgraŭ ĉio, la nomo de la unua famiĝas.

—Ĝis nun, mi ne povus juĝi lin freneza —diris en si don Lorenzo—. Sed ni daŭrigu.

Kaj li demandis tiam:

—Ŝajnas, ke via moŝto sekvis diversajn kursojn. Kion vi studis?

—La vagantan kavalirismon —respondis don Quijote—. Ĝi estas tiel bona kiel la poezio, kaj eĉ du colojn pli bona.

—Mi ne konas tian sciencan —diris don Lorenzo—, kaj ĝis nun mi ne aŭdis pri ĝi.

—Temas pri scienco —respondis don Quijote— kie enfermiĝas tute aŭ pliparte la ceteraj konoj de la mondo, se konsideri, ke ĝia praktikanto devas esti juristo kaj koni la leĝojn de la justeco distribua kaj komuta, ke li povu doni al ĉiu persono, tion, kio al li apartenas kaj ŝuldiĝas; li devas esti teologo por klare ekspliki sian kristanan religion, kie ajn oni lin demandas pri ĝi; li devas esti kuracisto, ĉefe herbaristo, por rekoni, meze de la dezertoj kaj sovaĝejoj, la herbojn kapablajn resanigi vundojn, ĉar la vagantaj kavaliroj ne devas ĉiupaŝe serĉi personon, kiu kuracu ilin; li devas esti astronomo por scii per la steloj kiom da noktaj horoj pasis, kaj en kia klimato de la mondo li troviĝas; li devas scii matematikon, ĉar ĉiumomente li devas helpi sin per ĝi; kaj krom tio, ke la teologiaj kaj naturaj virtoj devas lin ornami, mi menciu, se paroli nun pri detaletoj, ke li devas ankaŭ scii

naĝi kiel laŭdire naĝis fiŝo Nicolás aŭ Nicolao,^[272] hufumi ĉevalon kaj aranĝi ties harnison. Kaj rilate al la pli noblaj aferoj, jam menciitaj, li devas esti fidela al Dio kaj al sia damo, ĉasta en siaj pensoj, sincera en siaj vortoj, sindona en sia konduto, kuraĝa en siaj faroj, eltenema en siaj doloroj, donema al la paŭperaj kaj, fine, ĉampiono de la vero, eĉ se en ties defendo li perdus la vivon. Bona kavaliro vaganta devas esti dotita per ĉi grandaj kaj etaj kvalitoj, tiel do, sinjoro don Lorenzo, vidu, ke la kavalirismo ne instruas al siaj membroj sciojn de nazmukaj infanoj, kaj ke ĝi egalas al la plej sublimaj sciencoj lernataj en kolegioj kaj fakultatoj.

—Se tia, mi ne dubas, ke ĝi superas la ceterajn sciencojn — respondis don Lorenzo.

—Kiel, «se tia»? —demandis don Quijote.

—Mi volas diri —respondis don Lorenzo—, ke mi dubas, ĉu ekzistis aŭ ekzistas vagantaj kavaliroj kun tiel multaj virtoj.

—Kion mi asertas nun, mi jam diris antaŭe multe da fojoj. La pliparto de la homoj en ĉi mondo opinias, ke neniam ekzistis vagantaj kavaliroj, kaj, se la ĉielo ne plenumas miraklon por konvinki ilin pri la kontraŭo, fari ĉi-rilate ion alian tute vanus, kiel la sperto ofte montris al mi. Do mi ne volus klopodi nun eltiri vin el la eraro, kiun vi dividas kun la ĝenerala opinio; sed mi preĝos al la ĉielo, por ke vi vidu klare kaj komprenu, ke, en la pasintaj tempoj, la vagantaj kavaliroj utilis kaj necesis en la mondo, kaj ke nun, eĉ multe pli utilis, se ili aktivus; sed en la hodiaŭa mondo, kaj pro la pekemo de la homoj, triumfas la neniofarado, la pigro, la frandemo kaj la sinregalo.

—En la kapo de nia gasto jam zumas muŝo —diris en si don Lorenzo—. Sed li estas admirinda frenezulo, kaj mi stultus, se mi opinius alie.

Ĉi tie finiĝis ilia babilado, ĉar oni vokis ilin manĝi. Don Diego demandis al sia filo, kian konkludon li eltiris rilate al la mensa stato de la gasto, kaj don Lorenzo respondis:

—Ĉiuj kuracistoj kaj pelistoj de la mondo ne povus elkonduki lin el la korto de lia frenezo; sed li estas ŝanĝiĝema frenezulo, plena de lucidaj paŭzoj.

Oni sidiĝis ĉe la tablo, kaj la manĝo, pura, abunda kaj bongusta, estis tia, kian don Diego, kiel li antaŭe asertis sur la vojo, ĝenerale primetis por regalo de siaj gastoj. Sed plej plaĉis al don Quijote la mirinda silento, kvazaŭ kartuzia, reganta en la tuta domo. Oni demetis la tablotukon, donis dankon al Dio kaj akvon al la manoj, kaj tiam don Quijote insiste petis la junan don Lorenzo deklami la versojn de la literatura konkurso. Al tio li respondis:

—Mi legos mian gloson, por ne simili al certaj poetoj, kiuj ne konsentas legi siajn versojn, se oni petas ilin deklami, kaj, se ne petitaj, tiam ili vomadas senĉese siajn poemojn. Mi verkis la gloson nur por spertiĝi, sed ne esperas, ke ĝi ricevos ian premion.

—Unu saĝa amiko mia —respondis don Quijote— opiniis, ke ne valoras la penon komponi glosojn, ĉar, li diris, la glosa neniam povas adaptiĝi al la proponita teksto, kaj ĉiam, devias de la intenco kaj la celo de la temo glosenda. Li aldonis, ke la reguloj de la glos-arto tro severas, ke ili allasas nek demandajn formojn, nek «li diris» aŭ «li diros», nek la transformon de nomoj en verbojn, nek la ŝanĝon de senco, krom aliaj limigoj kaj restriktioj, kiel via moŝto certe scias.

—Vere, sinjoro don Quijote —diris don Lorenzo—, plaĉus al mi vidi vin foje fali en ian gravan eraron. Sed ne eblas, ĉar vi forglitas el inter miaj manoj kiel angilo.

—Mi ne komprenas kion vi volas diri per tio, ke mi forglitas el inter la manoj.

—Siatempe mi klarigos ĝin al vi —respondis don Lorenzo—. Sed nun, bonvolu atenti la gloson, kiu tekstas jene:

De «mi estis» al «mi estas»
sama stato regu plue;
aŭ ke jam alvenu frue
kio en «mi estos» nestas.

Gloso

Ĉar forpasas ĉio fine,
ankaŭ pasis la feliĉo,
kiun grandan laŭdestine
mi ĝuadis en sufiĉo,
dum mi vivas nun ruine.
De tre longe jam mi restas
ĉe piedoj viaj, Fato,
sed laŭŝajne vi siestas,
ĉar revenas ne la stato
de «mi estis» al «mi estas».

Min ne trafu nova gloro,
aŭ plezuro aŭ kontento,
aŭ triumfo aŭ honoro,
sed nur la iama sento
nun hantanta kun doloro.
Se vi Sorto, kontribue,
per redono de l' paseo
min favorus, sciu, ĝue
klamus mi kun spontaneo:
sama stato regu plue.

La neblon mi deziras:

la paseo, ĉar jam morta,
ne returnan vojon irus,
eĉ se povo la plej forta
tion volus kaj aspirus.
Tempo kuras, pasas flue,
flugas, hastas ĉioŝova,
kaj erarus kontinue
kiu volus ĝin senmova
aŭ ke jam alvenu frue.

Vivi en perpleks' mizera
kun espero kaj kun timo
estas kvazaŭ morto vera.
Preferindas do la fino
al la vivo plensufera.
Al mi plej konvene estas
morti jam; sed la teruro
super la konven' majestas,
diras eĉ ne per susuro
kio en «mi estos» nestas.

Kiam don Lorenzo finis la gloson, don Quijote stariĝis, prenis
lian dekstran manon kaj diris per voĉo laŭta, preskaŭ kria:

—Laŭdatu la alta ĉielo, nobla junulo! Vi estas la plej bona
poeto de la mondo kaj meritas porti laŭrkronon, ne de Ĉipro
aŭ de Gaeta, kiel diris certa poeto, kies animon Dio indulgu,
sed de la akademioj de Ateno, se ili ekzistus hodiaŭ, kaj de
la nunaj de Parizo, Bolonjo kaj Salamanca! La ĉielo disponu,
ke Febo trapiku per siaj sagoj la korpon de la juĝistoj, kiuj
rifuzos al vi la unuan premion, kaj ke la muzoj neniam
transpasu la sojlon de iliaj hejmoj! Bonvolu, sinjoro, se vi
deziras, deklami kelke de viaj versoj maĵoraj, ĉar mi volus
palpi la pulson de via admirinda genio en ties diversaj
partoj.

Ĉu ne amuze, ke, laŭdire, don Lorenzo aŭskultis kun plezuro la laŭdon de don Quijote, kvankam li konsideris la kavaliron freneza? Ho, forto de la flato! Kiel vi vastas, kaj kiel fore distas la limoj de via agrabla regno! Don Lorenzo konfirmis ĉi veron, ĉar, cedante al la peto de don Quijote, li deklamis la jenan soneton pri la fabelo aŭ historio de Piramo kaj Tisbe:

La muron rompis la pucelo bela,
kiu la koron de Piramo ŝiris;
de Ĉipro, Amo flugilbate iris
al tiu breĉo streta kaj fabela.

Parolis nur silento tim-rivela,
ĉar voĉoj tra la breĉo ne sin tiris;
sed ja la koroj: ilin Am' inspiris,
eterne ĉio-solva, bar-dispela.

En ŝi tro kreskas la deziro ama
kaj jam kun hasta, senprudenta koro,
la kompatinda en la morton drivas.

Afero stranga! Per la glavo sama
kaj per la samaj tombo kaj memoro
la paro mortis, kuŝas kaj plu vivas.

—Benata estu Dio! —diris don Quijote, aŭskultinte la soneton de don Lorenzo—. Inter la senfina nombro da poetoj de seka inspiro vivantaj en la mondo, elstaras la poezia talento da via moŝto, se juĝi la arton de via soneto!

Don Quijote gastis kvar tagojn ĉe don Diego, kie oni lin bele regaladis; ĉe la fino de la dirita tempo, li petis de don Diego permeson por foriri, dankis lin pro ties favoroj kaj pro tio, ke oni lin tiel afable akceptis; sed li aldonis, ke ne konvenas al la vagantaj kavaliroj dediĉi multe da horoj al la neniofarado kaj al la sinregalo, ke li volas denove iri plenumi sian devon

serĉante aventurojn, abundajn laŭdire en la regiono. Tiel li pasigus la tempon, ĝis okazus la turniroj en Zaragoza, kien li rekte irus; tamen li intencis unue penetri en la kavernon de Montesinos, pri kies interno oni rakontis en la regiono tiom da mirindaj historioj, kaj samtempe li esplorus kaj eltrovus la originon kaj la veran fonton de la sep lagoj ordinare nomataj «lagoj de Ruidera».

Don Diego kaj lia filo gratulis lin pro ties nobla decido, petis lin preni de ilia hejmo kaj bieno ĉion, kion li volus, ĉar ili plej plezure servus lin pro lia persona merito kaj pro lia honora profesio.

Alvenis fine la tago de la foriro, havigante ĝojon al don Quijote, sed triston kaj zorgon al Sancho Panza, tial, ke tre plaĉis al li la abundo reganta ĉe don Diego, kaj nur kontraŭvole li pretis reveni al la malsato kutima en la arbaroj kaj dezertaj lokoj kaj al la magra viktualio de sia mizere provizita ŝarĝo-selo. Sed li plenŝtopis ĝin per ĉio, kion li konsideris necesa, kaj poste, en la momento de la adiaŭo, don Quijote diris al don Lorenzo:

—Mi ne scias, ĉu mi jam diris al vi, kaj se jes mi ripetas ĝin, ke se via moŝto volus ŝpari al vi penadon kaj krutaĵojn sur la vojo al la neatingebla pinto, kie staras la templo de la Famo, vi devus nur devii de la nur iom streta pado de la poezio kaj sekvi la plej stretan en la mondo, la padon de la vaganta kavalirismo, sed ĉe kies fino vi povus fariĝi imperiestro en palpebruma daŭro.

Per tiaj vortoj don Quijote fine dispelis ajnan dubon, kiu povus ekzisti pri lia freneza stato, des pli kiam li aldonis:

—Dio scias, ke al mi tre plaĉus preni don Lorenzon kun mi por instrui lin, kiel oni devas indulge trakti la humilan kaj submeti kaj treti la orgojlan, konforme al la virtoj propraj al

mia profesio. Sed tial, ke pro sia juna aĝo kaj sia laŭdinda verkado li ne povus min akompani, mi kontentiĝas asertante al li, ke li povos akiri al si famon kiel poeto, se li atentas kaj sekvas la opinion de la aliaj, prefere al la propra, ĉar ne ekzistas patro aŭ patrino kapabla trovi sian filon turpa, des malpli kiam temas pri filoj de la cerbo.

La patro kaj la filo denove miris je la mikso de saĝo kaj folo en la diroj de don Quijote kaj je lia obstino dediĉi sin al la unika celo de siaj klopodoj, t.e. al sia misfortuna aventurado. Ili ripetis al li sian servopretecon kaj komplimentojn, kaj poste, adiaŭinte la sinjorinon de la kastelo, don Quijote sur Rocinante, kaj Sancho sur la azeno, rajdis for.

[269] Tiel komenciĝas unu el la plej famaj sonetoj de Garcilaso de la Vega, preferata poeto de Cervantes.

[270] Neologismo: Skribe aŭ parole, provizora dekliniĝo el la ĉefa temo aŭ argumento.

[271] Tial don Quijote uzas nun balteon, ne rekte kontaktan kun la renoj, anstataŭ portepeo.

[272] Fabela fiŝ-homo ofte citata en verkoj renesancaj. Li tiel same loĝis en la maro kiel sur la tero kaj naĝis ofte de Sicilio al kontinenta Italujo.

Ĉapitro 19

Kie oni rakontas la aventuron de enamiĝinta paŝtisto, kun aliaj vere amuzaj eventoj

Don Quijote troviĝis ankoraŭ je eta distanco de la vilaĝo de don Diego, kiam li renkontis du virojn kun aspekto de pastroj aŭ studentoj,^[273] kaj du kampulojn; la kvar rajdis sur kvar azeninoj; unu el la studentoj portis, envolvitajn en peco el verda lino uzata kiel vojaĝosako, ion similan al drapo skarlata kaj du parojn da trikitaj ŝtrumpoj; la alia studento havis nur unu novan paron da skermaj rapiroj kun ties ledaj pintoj. La kampuloj portis kun si kelke da diversaj varoj montrantaj, ke ambaŭ aĉetis ilin en ia granda urbo kaj ilin transportas al sia vilaĝo. La studentoj kaj la kampuloj tiom miris je la hidalgo, kiom ordinare la personoj vidintaj lin por la unua fojo, kaj deziregis scii kiu estas tiel eksterordinara vivo.

Don Quijote ilin salutis kaj, sciiĝinte, ke ili sekvas lian propran vojon, proponis al ili sian kompanion kaj petis ilin moderigi sian iron, ĉar iliaj azeninoj pli rapidis ol lia ĉevalo. Poste, komplezeme, li skize rakontis al ili pri si mem kaj pri sia ofico kaj profesio de vaganta kavaliro, aldonante, ke li serĉas aventurojn ĉie en la mondo, ke li havas la nomon don Quijote de La Mancha kaj la alnomon Kavaliro de La Leonoj.

Ĉio ĉi sonis kiel greka aŭ ĵargona lingvo en la oreloj de la kampuloj, sed la studentoj baldaŭ komprenis, ke la cerbo de don Quijote ne bone funkcias; tamen ili rigardis lin kun admiro kaj respekto, kaj unu diris:

—Se via moŝto, sinjoro kavaliro, ne sekvas determinitan vojon, kiel kutimas la serĉantoj de aventuroj, venu kun ni, kaj vi vidos unu el la plej belaj kaj riĉaj edziĝo-festoj ĝis nun okazintaj en La Mancha kaj en la distanco de multaj mejloj ĉirkaŭe.

Don Quijote demandis, ĉu temas pri la nupto de ia princo, se konsideri, ke la alia mencias tiel entuziasme la aferon.

—Ne —respondis la studento—. Temas pri la edziĝo de kampulo kaj kampulino. Li estas la plej riĉa en ĉi regiono, kaj ŝi, la plej bela iam vidata de la homoj. La aranĝoj por la nupto montriĝas plej eksterordinaraj kaj kuriozaj, ĉar ĝi okazos en herbejo situanta apud la vilaĝo de la fianĉino. Oni ŝin nomas, tre laŭvere, Quiteria la bela, kaj la fianĉon, Camacho la riĉa. Ŝi havas dek ok jarojn, li dudek, kaj ambaŭ same rangas, kvankam scivoluloj konantaj parkere ĉies genealogion asertas, ke la familio de Quiteria superas la familion de Camacho; sed nuntempe oni ne atentis tion, ĉar la mono povas ŝtopi multe da breĉoj. Efektive, ĉi Camacho estas prodigema kaj havas la kapricon, ke oni kovru per volbo el branĉoj la tutan herbejon, tiel, ke la suno devos sufiĉe penadi, se ĝi volos penetri ĝis la verda herbo de la grundo. Li ankaŭ prezentos spado-dancojn, kaj same tintildancojn,^[274] ĉar en la vilaĝo vivas homoj kapablaj plej sperte sonorigi kaj skui la tintilojn. Pri la ŝu-klakantaj danculoj nenion mi diras, ĉar li invitis grandan nombron da ili. Tamen la nupto iĝos plej memorinda, ne pro la ĵus menciitaj aferoj, aŭ pro multaj aliaj, kiujn mi ne citis, sed pro tio, kion certe faros la disdegnata Basilio. Ĉi Basilio estas paŝtisto en la sama vilaĝo de Quiteria, kaj nur unu muro staris inter lia domo kaj la domo de la gepatroj de la knabino. La Amo do kaptis la okazon revivigi en la mondo la jam forgesitan idilion de Piramo kaj Tisbe, ĉar Basilio enamiĝis al Quiteria jam de sia fruaj jaroj, kaj ŝi reciprokis lian kor-inklinon per mil diversaj kaj honestaj favoroj, tiel, ke

la amo inter la infanoj Basilio kaj Quiteria estis motivo de amuzaj komentoj en la vilaĝo. Kiam ili kreskis, la patro de Quiteria decidis proĥibi al Basilio, ke li plu vizitu lian hejmon, kiel ordinare li faris ĝis tiam, kaj, por ŝpari al si vivon plenan de zorgoj kaj suspektoj, la patro aranĝis la edziniĝon de sia filino al la riĉa Camacho, konsiderinte, ke Basilio ne konvenas al ŝi, ĉar lin pli favoris la naturo ol la Fortuno. Kaj, se diri la honestan veron, Basilio estas plej vigla junulo, granda ĵetanto de la fer-stango, elstara en la luktoj, sperta en la man-pilkaj ludoj; li kuras kiel cervo, saltas pli ol kapro, faligas la keglojn kvazaŭ mirakle, kantas kiel alaŭdo kaj, plukante la gitaron, igas ĝin preskaŭ paroli. Sed precipe li lertas per la glavo kiel la plej bona skermisto.

—Sole pro ĉi lasta talento —diris don Quijote— ĉi junulo meritas edziĝi, ne nur al la bela Quiteria, sed, se ŝi vivus ankoraŭ, al la reĝino Ginevra mem spite al Lanceloto kaj spite al ĉia oponento.

—Rakontu tion al mia edzino —diris Sancho Panza, kiu ĝis tiam aŭskultis silente—. Al ŝi plaĉas, ke ĉiu edziĝu al homo de sia sama rango, konforme al la proverbo «Ĉiu angulo kun sia sanktulo». De mia flanko mi dezirus, ke ĉi brava Basilio (mi jam komencas simpatii al li) edziĝu al sinjorino Quiteria. Havu feliĉan morton kaj eternan vivon en la paradizo (mi preskaŭ diris «ne havu») la personoj oponentaj al la geedziĝo de enamiĝintaj paroj.

—Se ĉiuj amantoj geedziĝus —diris don Quijote—, la patroj perdus sian rajton decidi, kiam devas edziĝi la filoj kaj al kia persono; kaj se la filinoj povus elekti laŭplaĉe siajn edzojn, sendube kelkaj prenis al si la serviston de sia patro, kaj aliaj ajnan stratulon, kiun ili trovus brava dando, eĉ se li vere estus ia fripona spadistaĉo. Ja la amo kaj la pasio facile blindigas la okulojn de la racio, tiel necesa por fari decidon rilate al la ŝanĝo de stato; kaj la edza stato tiel delikatas kaj

tiel facile endanĝeriĝas, ke necesas granda takto kaj speciala favoro de la ĉielo por trafe elekti. Se prudenta homo deziras fari longan vojaĝon, li serĉas, antaŭ ol ekiri sur la vojo, fidindan kaj agrablan personon kiel kunvojaĝanton. Kial do ne fari same, kiam li devas vojaĝi sian tutan vivon ĝis la pordoj de la tombo? Des pli, se lia akompananta persono devas esti kun li en la lito, ĉe la tablo kaj ĉie ajn, kiel okazas inter edzo kaj edzino. La akompano de la propra edzino estas, ne ia varo, kiun oni aĉetus por poste redoni, interŝanĝi aŭ revendi ĝin, sed neŝanĝeblaĵo daŭranta tiel longe kiel la vivo, maŝo transformiĝanta, kiam oni ĝin metas ĉirkaŭ sian kolon, en gordian nudon, ĉar ne eblas ĝin malligi, kaj nur la falĉilo de la morto ĝin distranĉas. Multe pli da aferoj mi povus diri pri ĉi temo, sed min detenas tio, ke mi scivolas, ĉu la sinjoro licenciulo havas ion por aldoni al sia historio de Basilio.

La studento, eble bakalaŭro, aŭ eble licenciulo, kiel titolis lin don Quijote, respondis:

—Mi havas por diri nur, ke, de la momento mem kiam Basilio sciis, ke la bela Quiteria edziniĝos al Camacho la riĉa, li ne plu ridas aŭ racie parolas. Li ĉiam vidiĝas enpena kaj trista kaj paroladas al si mem, kio pruvas, ke li perdis la saĝon; li manĝas apenaŭ nur fruktojn, kaj, se li dormas, li dormas en la kamparo, sur la dura tero, kiel sovaĝa besto; de tempo al tempo li levas la rigardon al la ĉielo, kaj en aliaj okazoj okulas tiel absorbite al la tero, ke li ŝajnas statuo, kies vestojn movus la vento. Unuvorte, li montriĝas tiel konsumita de la amo, ke ni timas, ke la «jes» morgaŭ prononcota de la bela Quiteria signos lian morto-kondamnon.

—Dio trovos rimedon, ĉar Li donas la vundon, sed ankaŭ la kuracilon —diris Sancho—. Neniu scias kio okazos. De nun ĝis morgaŭ pasos multaj horoj, kaj en unu sola horo, eĉ en

unu momento, povas fali domo. Mi vidis samtempe pluvi kaj suni; oni enlitiĝas sana en la nokto kaj en la sekvanta mateno ne povas movi sin. Kaj diru, ĉu eble iu povas fanfaroni, ke li fiksas per najlo la radon de la Fortuno? Certe ne. Kaj inter la «jes» kaj la «ne» de virino mi ne riskus meti la pinton de kudrilo, ĉar ĝi ne trovas sufiĉan spacon. Se Quiteria amas Basilion per sia tuta koro kaj volo, mi aŭguras lin feliĉa, ĉar, laŭdire, la amo vidigas per speciala nazumo la kupron oro, la paŭperan riĉa kaj la okulmukon perloj.

—Dio vin damnu, Sancho! Ĉu vi ne ĉesos paroli? —diris don Quijote—. Kiam vi komencas sputi proverbon post proverbo kaj fabelon post fabelo, nur Judaso (li prenu vian animon) povus vin toleri. Diru, besto: kion vi scias pri najloj, radoj aŭ pri io alia?

—Ho, se oni ne komprenas min, ne mirinde, ke oni rigardas absurda kion mi diras. Sed ne gravas. Mi komprenas min kaj scias, ke mi ne diris multe da stultaĵoj. Okazas nur, ke via moŝto estas ĉiam kritikisto de miaj opinioj kaj eĉ de miaj faroj.

—Oni devas diri «kritikisto», ne «kitikristo». Sancho, ne fuŝu la lingvon, Dio vin damnu.

—Ne koleru kontraŭ mi, sinjoro —respondis la ŝildisto—. Vi scias, ke mi ne edukiĝis en la ĉefurbo, nek studis en Salamanca por lerni, ĉu mi aldonas aŭ ŝanĝas ajnan literon en miaj vortoj. Krome, je Dio, ne pretendu, ke vilaĝano de Sayago parolu kiel ulo de Toledo,^[275] kvankam sendube ekzistas ankaŭ toledanoj, kiuj ne tre eminentas en la afero paroli bele.

—Certe —diris la licenciulo—. La personoj loĝantaj inter la tanejoj kaj en la placo de Zocodover ne povas paroli tiel bone, kiel la homoj kiuj, por ekzemplo, pasas la pliparton de

la tago promenante en la klostroj de la katedralo. La lingvo pura, klara, senerara kaj eleganta estas parolata de la korteganoj edukitaj, eĉ se ili naskiĝis en Majalahonda.^[276] Mi diris edukitaj, ĉar al multaj mankas eduko, t.e. la gramatiko de la korekta lingvo, kiu perfektigas per la uzo. Mi, sinjoroj, studis kanonan juron en Salamanca kaj iomete fieras, ke mi esprimas mian penson per vortoj klaraj, simplaj kaj signifaj.

—Se vi ne fierus pli pri tio, ke vi uzas pli lerte vian rapiron ol la lingvon, vi estus atingita la unuan lokon en la licenciaj ekzamenoj, ne la lastan —diris la alia studento.

—Aŭskultu, bakalaŭro Corchuelo —respondis la licenciulo—. Se vi pensas, ke tute vanas la scio de la skermado, vi defendas la plej eraran opinion de la mondo.

—Ne temas pri simpla opinio, sed pri bone fundamentita vero —diris Corchuelo—. Kaj se vi volas, ke mi praktike pruvu ĝin al vi, nu, la afero facilas: rapirojn vi portas, tempon ni disponas, mi havas forton kaj muskolojn, kaj kun tio kaj mia kuraĝo, ne ignorinda, mi igos vin konfesi, ke mi ne trompiĝas. Deseliĝu kaj helpu vin per via fleksado de kruroj, per viaj cirkloj, anguloj kaj per la cetero de via scienco. Malgraŭ mia kruda kaj elementa sperto, mi esperas, ke mi igos vin vidi la stelojn en plena tagmezo. Ankoraŭ ne naskiĝis la viro kapabla igi min turni la dorson, nek ekzistas en la mondo persono, kiu ne cedus antaŭ miaj atakoj.

—Ne estas mia afero, ĉu vi turnas la dorson aŭ ne —respondis la skermulo—. Sed povus okazi, ke oni fokus al vi la tombon en la unua loko, kie vi fiksus la piedojn; mi volas diri, ke la scienco de vi disdegnata faligus vin tie.

—Tion ni vidos nun —diris Corchuelo.

Li saltis rapide de sur la azeno, kaj furioze elŝiris unu el la rapiroj portataj de la licenciulo sur ties rajd-besto.

—Ne decas tiel —interrompis don Quijote—. Mi arbitracios ĉi duelon kaj juĝos la rezulton de ĉi nesolvita afero,^[277] vane diskutata de longe tiom da fojoj.

Li desaltis Rocinante, prenis la lancon kaj lokis sin meze de la vojo; dume, la licenciulo, kun gracia teniĝo de la korpo kaj kadencaj paŝoj, avancis kontraŭ Corchuelo, kiu, de sia flanko, impetis kontraŭ la licenciulo, ĵetante, kiel oni diras, fajron el la okuloj.

La du akompanantaj kampuloj ĉeestis ĉi sangan tragedion sen desalti de siaj azenoj. La hake, pinte, desupre, delive kaj dumane ellasitaj batoj de Corchuelo falis en nekalkulebla nombro kaj pli densaj ol hajlo. Li atakis kiel kolera leono, sed ĉiam lia buŝo frapiĝis kontraŭ la ŝirmita pinto de la licenciula rapiro, tiele, ke, malgraŭ sia furiozo, li devis ofte halti, kisante la ŝirmilon kvazaŭ relikvon, kvankam ne kun la ŝuldata pieco. Fine la licenciulo komencis nombri, kaj samtempe tuŝi per la rapiro, ĉiun butonon de la sutano de sia oponento, ŝiris ĝian suban parton en franĝojn similajn al la tentakloj de polpo, faligis dufoje lian ĉapelon, kaj tiel multe superskermis lin, ke la alia, plena de ĉagreno kaj kolero, prenis sian rapiron je la tenilo kaj forĵetis ĝin tiel forte, ke ĝi falis preskaŭ du mejlojn for, laŭ la atesto poste farita de unu el la kampuloj, kiu estis ankaŭ aktisto: kaj lia atesto utilis kaj utilas, por ke oni konu kaj vidu, ke, vere, la scienco superas la forton.

Corchuelo, elĉerpita, sidiĝis; tiam, Sancho proksimiĝis al li kaj diris:

—Je Dio, sinjoro bakalaŭro, se via moŝto dezirus sekvi mian konsilon, ne plu provoku ajnan personon skermi kontraŭ vi,

sed prefere defiu lin ĵeti la ferstangon aŭ lukti, ĉar vi estas sufiĉe forta kaj juna por tio. Cetere, mi aŭdis, rilate al lertaj skermantoj, ke ili kapablas pasigi la pinton de rapiro tra la truo de kudrilo.

—Mi kontentas per tio, ke mi vekiĝis el mia eraro. La sperto instruis al mi unu veron, kiun mi tute ne kredis —diris Corchuelo.

Kaj, stariĝinte, li brakumis la licenciulon, ili fariĝis pli intimaj amikoj ol antaŭe, kaj pensante, ke pasus ankoraŭ longa tempo ĝis la reveno de la kampulo-aktisto, irinta repreni la forĵetitan rapiron, ili decidis ne atendi lin kaj daŭrigi la vojaĝon por alveni en bona horo al la vilaĝo de Quiteria, kie ili loĝis.

Dum la resto de la vojaĝo, la licenciulo parolis al ili pri la superaj kvalitoj de la skerma arto kaj aldonis tiom da pruvaj rezonoj kaj tiom da figuroj kaj matematikaj demonstroj, ke ĉiuj konvinkiĝis pri la utilo de ĉi scienco, dum Corchuelo resaniĝis de sia obstina eraro.

La nokto komencis fali, sed jam proksimaj al sia celo ili ricevis la impreson, ke antaŭ la vilaĝo etendiĝas ĉielo plena de nekalkuleblaj kaj brilaj steloj; samtempe ili aŭdis konfuzan kaj dolĉan sonon el diversaj instrumentoj kiel flutoj, tamburetoj, psalterioj, hobojoj kaj tamburinoj, kaj, kiam ili pli proksimiĝis, ili vidis, ke la branĉoj de grandaj arbustoj, mane transportitaj kaj lokitaj ĉe la enirejo de la vilaĝo, plenas de lampionoj ne tuŝataj de la zefiro, ĉar ĝi blovis tiel milde, ke ĝi eĉ ne havis forton por movi la foliojn de la arboj. En tiel agraba loko la muzikistoj estis la animantoj de la festo kaj en diversaj grupoj dancis, kantis kaj ludis la jam menciitaj instrumentojn. Efektive, ŝajnis, kvazaŭ ĉie sur la herbejo kapriolus la ĝojo kaj kurus la plezuro. Aliaj multaj homoj laboris starigante platformon, de

kie oni povus vidi en la sekvanta tago la dancojn kaj la ludojn prezentotajn en tiu sama loko, kie oni festus la edziĝon de la riĉa Camacho, kaj kie okazus ankaŭ la morto de Basilio.

Don Quijote ne volis eniri en la vilaĝon, malgraŭ la petoj de la kampulo kaj de la bakalaŭro, kaj ekskuzis sin per la argumento, absolute solida laŭ li, ke la vagantaj kavaliroj kutimas dormi en la kampoj kaj en la arbaroj prefere ol en urboj kaj vilaĝoj, eĉ se ili kuŝus sub oraj tegmentoj. Tion dirinte, li iom deviis de la vojo ĉe la granda ĉagreno de Sancho, al kies memoro venis tio, kian belan vivon li ĝuis kiel gasto en la kastelo aŭ domo de don Diego.

[273] Oni memoru, ke, en la epoko de Cervantes, tre similis la kostumoj pastraj kaj studentaj.

[274] En festoj kaj publikaj amuzoj, kelkaj dancantoj metis al si ĉirkaŭ la kruroj vicojn da tintiletoj kaj ilin sonigis laŭ la ritmo de la muziko.

[275] Cervantes kontraŭmetas la rustikan lingvon de la saĝaganoj (naskiĝintoj aŭ loĝantoj en Sayago) al la rafinita kaj bela lingvo tiam parolata en Toledo.

[276] Vilaĝo proksima al Madrido. Laŭfame en ĝi oni tre fuŝe parolis la hispanan.

[277] Aludo al la tiama polemiko, ĉu en la skermado, la scienco valoras pli ol la forto kaj la impeto.

Ĉapitro 20

Kie oni rakontas la edziĝon de Camacho la riĉa kaj la aventuron de Basilio la paŭpera

Apenaŭ la blonda Aŭroro permesis al la brila Febo sekigi per la ardo de siaj varmaj radioj la likvajn perlojn de ŝiaj oraj haroj, kiam don Quijote forskuis de siaj membroj la dormemon, stariĝis kaj vokis sian ŝildiston Sancho, kiu ankoraŭ ronkis. Tiam, antaŭ ol veki lin, la hidalgo diris:

—Ho vi, plej feliĉa homo el la vivantaj sur ĉi tero, ĉar, senenvia kaj ne enviata, vi pace dormas, ne persekutas vin sorĉistoj, kaj la ensorĉoj kaŭzas al vi nenian zorgon. Dormu, mi diras milfoje, dormu. La ĵaluzoj pro via damo, aŭ la penso kiel pagi ŝuldon, aŭ la obsedo kion fari por ankaŭ en la morgaŭa tago nutri vin kaj vian etan kaj angorplenan familion, ne tenas vin en konstanta vekiteco. Nek la ambicio perturbas vin, nek vi sopiras la vanan pompon de ĉi mondo. La limoj de viaj deziroj ne etendiĝas preter la prizorgo al via azeno, ĉar vi ŝarĝis sur min la prizorgon al via propra persono: kompensan devon, kiun la naturo kaj la moroj trudas al la mastroj. La servisto dormas, dum la sinjoro vigilas, pensante kiel nutri, favori kaj rekompenci lin. La aflikto vidi, ke la ĉielo indiferentas kaj rifuzas al la tero ĝian necesan roson, korpremas, ne la serviston, sed la mastron, kiu devas nutri lin, ne nur en epokoj de abundo kaj fertilo, sed ankaŭ en tempoj de sterilo kaj malsato.

Sancho nenion respondis, ĉar li dormis, kaj ne vekigis baldaŭ, se don Quijote ne rekonsciigus lin per la ekstremo de la lanco. Fine Sancho vekigis, dormema kaj lantamova, turnis ĉien la vizaĝon kaj diris:

—De tiu branĉo-volbo venas forta odoro multe pli propra al rostitaj grivoj ol al narcisoj kaj timianoj, se mi ne trompiĝas; edziĝa festo komenciĝanta per tiaj odoroj sendube indikas riĉon kaj abundon.

—Jam fermu la buŝon, glutema —admonis don Quijote—. Nun ni iru ĉeesti la ceremonion por vidi kion faros la disdegnata Basilio.

—Li faru laŭplaĉe —respondis Sancho—. Se li estus riĉa, li edziĝus al Quiteria. Kia stultaĵo, havi eĉ ne unu soldon kaj voli edziĝi super la nuboj! Je Dio, sinjoro, mi opinias, ke la paŭperaj devas kontentiĝi per io ajn kaj ne peti de ulmo pirojn. Mi vetus unu el miaj brakoj, ke Camacho povas kovri Basilion per oraj moneroj; kaj se tiel, kaj nedubeble tiel estas, Quiteria tro stultus, se ŝi rifuzus la juvelojn kaj garnojn al ŝi donitajn kaj donotajn de Camacho, kaj preferus la stango-ĵeton kaj la skermadon de Basilio. En la taverno oni ne donas kruĉon da vino por bona stango-ĵeto aŭ por lerta finto de rapiro, t. e. por scioj kaj talentoj ne vendeblaj, eĉ se ilin posedus grafo Dirlos.^[278] Sed, kiam tiaj talentoj garnas viron riĉan, mi dezirus, ke mia vivo estus tiel estiminda, kiel estimindaj ili ŝajnas. Nur sur solidaj fundamentoj oni povas konstrui solidan domon, kaj la plej solida fundamento kaj bazo de ĉi mondo estas la mono.

—Je Dio, Sancho —interrompis lin don Quijote—. Jam metu finon al via litanio. Mi kredas, ke, se oni lasus vin elbabili ĉion, kion vi komencas ĉiumomente, mankus al vi tempo por manĝi kaj dormi. Vi uzas vian tutan tempon nur por paroli.

—Se via moŝto havus bonan memoron —respondis Sancho —, vi memorus nun la klaŭzojn de la interkonsento, kiun ni faris antaŭ ol ni elvadis de nia hejmo ĉi lastan fojon. Unu el la klaŭzoj diras, ke mi rajtas paroli kiom mi volas, kondiĉe ke

mi traktu nenion kontraŭ aliaj personoj aŭ kontraŭ via moŝto. Kaj mi kredas, ke ĝis nun mi observas la klaŭzon.

—Mi ne memoras pri tia klaŭzo —diris don Quijote—. Sed, eĉ se vi pravus, mi nun deziras, ke vi silentu kaj sekvu min. La instrumentoj aŭditaj hieraŭ nokte jam komencas animi ĉi valon. Certe la edziĝo okazos, ne en la varmo de la posttagmezo, sed en la freŝo de la mateno.

Sancho, obeante la ordonon de sia mastro, metis la selon sur Rocinante kaj la ŝarĝo-selon sur la azenon; poste la du viroj ekrajdis kaj, paŝon post paŝo, eniris en la branĉo-volbon. Antaŭ la okuloj de Sancho montriĝis unue, trapikita per kompleta trunko de ulmo, tuta bovido, kiu rostiĝadis super la flamoj de eta monto de ligno; ses marmitoj, starantaj ĉirkaŭ la fajro, certe ne prenis sian formon en la komuna muldilo de la ordinaraj marmitoj, ĉar temis pri ses duonĵaroj kun sufiĉa spaco por enteni, ĉiu el ili, buĉejon plenan de viando; ne strange do, ke ili glutis kaj enfermis en si, sen videbla peno, tutajn ŝafojn, kvazaŭ kolombidojn. En nekalkulebla nombro, leporoj jam sen haŭto, kaj senplumaj kokinoj pendis de la branĉoj kaj atendis esti baldaŭ sepultitaj en la marmitojn; same ne kalkuleblis birdoj kaj ĉasaĵoj pendigitaj sur la arboj, ke ili fridiĝu. Sancho kalkulis, ke tie troviĝas pli ol sesdek vinsakoj, ĉiu kapabla enteni pli ol kvindek pindojn, kaj —kiel poste vidiĝis— plenaj de bonega vino. Stakoj da blankaj panoj staris simile al la montetoj da tritiko troveblaj en la draŝejoj. La fromaĝoj, metitaj unuj sur aliaj, kiel brikoj, formis muron, kaj en du kaldronoj kun oleo, pli grandaj ol la tinoj de tinkturejo, frittiĝis farunaĵoj poste elprenataj per fortaj ŝoveliloj kaj mergataj en alian apudan kaldronon plenan de varma mielo. La gekuiristoj superis la nombron de kvindek, ĉiuj puraj, diligentaj kaj gajaj. En la disstreĉitan ventron, jam rekruditan, de la rostiĝanta bovido, oni antaŭe metis

dekduon da molaj kaj etaj suĉ-porkidoj, por ke ĝi iĝu pli bongusta kaj facile maĉebla.

Ŝajnis, ke la divers-specajn kondimentojn oni akiris, ne per funtoj, sed per buŝeloj, ĉar ili montriĝis ĝis super la rando de granda kofro. Unuvorte, la viktualio por ĉi edziĝo estis rustika, sed sufiĉe abunda por nutri armeon.

Ĉion rigardis Sancho Panza, ĉion li gapis, ĉion li volis. Lia deziro ekscitiĝis kaj kapitulacis antaŭ la marmitoj, kaj volontege li prenis el ili bonan plenteleron; poste lia volo submetiĝis al la vin-sakoj kaj fine al la produktoj de la pato, se oni povas doni la nomon pato al tiel ronde vastaj kaldronoj; sekve, nekapabla plu elteni, kaj sen ke li povus fari alion, li proksimiĝis al unu el la diligentaj kuiristoj kaj petis kun ĝentilaj kaj malsataj vortoj, ke oni permesu lin trempi pecon da seka pano en unu el la marmitoj.

—Frato —respondis la kuiristo—. Dank' al la riĉa Camacho, la malsato havas nenian povon super la hodiaŭa tago. Deseliĝu, vidu ĉu ie troviĝas ajna kulerego, elŝaŭmigu unu du kokinojn, kaj ili faru al vi bonon en la stomako.

—Mi vidas nenian kuleron —respondis Sancho.

—Atentu do —diris la kuiristo—. Je Dio, kiel hezitema kaj delikataĉa ulo vi estas!

Kaj, tion dirante, li prenis grandan kuir-poton, ĝin enpuŝis en unu el la duonĵaroj, kaj denove eltiris ĝin kun tri kokinoj kaj du anseroj.

—Prenu, amiko, kaj gustumu ĉi pecetojn kiel anticipon de la ĉefa manĝo.

—Mi havas nenion por ilin kunporti.

—Nu, prenu ilin kun la poto —respondis la kuiristo—. La riĉo kaj la kontento de Camacho ĉion provizas.

Dum Sancho okupiĝis tiel, don Quijote rigardis la eniron, en la branĉo-volbon, de dek du kampuloj en festaj kostumoj; ili rajdis sur dek du belegaj ĉevalinoj garnitaj per ĉarmaj harnisoj kaj per multaj tintiloj sur la brusto-rimenoj. La kampuloj galopis en kompakta grupo, kaj ne unu fojon sed multajn, la longon de la herbejo, kriante en gaja tumulto:

—Longe vivu Camacho kaj Quiteria! Li estas tiel riĉa, kiel ŝi bela; kaj ŝi belas pli ol la aliaj virinoj de la mondo.

Aŭdante tion, don Quijote diris en si:

—Oni klare vidas, ke ili ne konas mian Dulcinea de El Toboso; alie, ili ne farus tiom da laŭdoj al ĉi Quiteria.

Iom poste, de diversaj lokoj komencis eniri en la branĉo-volbon multaj danco-grupoj, inter ili unu el glavo-dancantoj formita de dudek kvar junuloj de brava kaj gracie aroganta aspekto, vestitaj per tre delikataj kaj blankaj toloj kaj portantaj buntajn kaptukojn el fajna silko. Unu el la surĉevalinaj kampuloj demandis al la gvidanto de la danco-grupo, junulo tre vigla, ĉu iu el la dancantoj vundiĝis.

—Ĝis nun, ne, dank' al Dio. Ni ĉiuj bone fartas —respondis la junulo.

Tuj poste li miksiĝis kun siaj kompanoj kaj tiel lerte komencis sin turni dance, ke, kvankam don Quijote ofte vidis tiajn spektaklojn, li konfesis en si, ke neniam antaŭe li ĉeestis tiel belan dancon.

Same plaĉis al li alia danco plenumita de belegaj puceloj, tiel junaj, ke, ŝajne, la plej aĝa havis ne pli ol dek ok jarojn, kaj la malplej aĝa, dek kvar. Ili ĉiuj portis verdajn robojn, kaj

ilia hararo, parte plektita, parte libera, tiel brile blondis, ke la kapoj, kronitaj per girlandoj el jasmenoj, rozoj, amarantoj kaj loniceroj facile rivalus kun la suno mem. Ilin gvidis respektinda oldulo kaj maturaĝa matrono pli leĝeraj kaj facilmovaj ol oni povus supozi, konsiderante ilian aĝon. La puceloj dancis laŭ la takto de Zamora sak-ŝalmo kaj kun siaj honestaj rigardoj kaj mienoj kaj leĝeraj piedoj montriĝis la plej spertaj danculinoj de la mondo.

Post ili aperis alia danco-grupo el la konataj sub la nomo de «spektaklo kun paroloj». Ĝin formis ok nimfoj en du vicoj; unu vicon gvidis la dio Kupido, la alian la Intereso. Kupidon ornamis flugiloj, arko, sagoj kaj sagujo, kaj la Intereso portis buntan robon silkan kaj oran. La nimfoj akompanantaj Kupidon portis sur la dorso siajn respektivajn nomojn skribitajn per grandaj literoj en blankaj pergamenoj. *Poezio* nomiĝis la unua; *Saĝo* la dua; *Bona familio* la tria; *Kuraĝo* la kvara. La sekvantinoj de la Intereso portis same siajn nomojn: *Oferemo*, legiĝis sur la unua; *Donaco* sur la dua; *Trezoro* sur la tria, kaj *Paca posedo* sur la kvara. Ĉe la antaŭo de la grupo iris ligna kastelo trenata de kvar sovaĝuloj kovritaj per hedero kaj en kanabaj toloj verde tinkturitaj, kaj la kvar vidiĝis tiel kvazaŭ-veraj, ke Sancho preskaŭ teruriĝis ĉe ilia aspekto. Sur la fasado de la kastelo kaj sur ties tri aliaj flankoj legiĝis la jeno: *Kastelo de la Pudoro*; kvar lertaj ludantoj de tamburetoj kaj flutoj komencis muziki kaj, laŭ ilia takto, Kupido ekdancis kaj, farinte du turnojn, levis la okulojn, streĉis la arkon kaj celante al pucelo staranta inter la kreneloj de la kastelo, diris al ŝi:

Estas mi potenca dio
en ĉielo kaj sur tero,
en la maro, super ĉio,
eĉ en hida la infero
kaj ties teritorio.
Mi neniam spertas timon:

kion volas mi, mi povas,
eĉ se mi neblon trovas.
Mi trapasas ĉian limon,
estras, metas kaj forŝovas...

Fininte la koplön, li pafis sagon super la kastelon kaj sin
retiris al sia loko. Poste elpaŝis la Intereso, faris same du
turnojn, silentiĝis la tamburetoj, kaj li diris:

Povas mi pli ol Amoro,
kvankam ĉiam li min gvidas.
Mia familia gloro
super ĉies glor' prezidas,
ĉar ĝin vartis Di-favoro.
Jen mi staras, l' Intereso;
etan bonon mi inspiras,
sed sen mi nenio iras.
Tia estas mi sen ĉeso,
prenu min, se vi deziras.

Retiris sin la Intereso, elpaŝis la Poezio, faris siajn turnojn,
kiel la aliaj, kaj, kun la okuloj fiksitaj sur la junulino de la
kastelo, diris:

En dolĉegaj epitetoj
la dolĉega poezio
per la plumoj de poetoj
laŭdas vin kun emocio,
vin portretas mil sonetoj.
Se bonŝance vin ne ĝenos,
ke mi daŭre vin prilaŭdos
dum enviulinoj paŭtos,
al la famo mi vin prenos,
oni ĉie pri vi aŭdos.

La Poezio iris flanken, la Oferemo elpaŝis el la grupo de la Intereso kaj, farinte siajn turnojn, diris:

Oni nomas oferemo,
doni per prudenta saĝo,
forkurante de l' ekstremo
prodigadi sen domaĝo
aŭ avari eĉ kun peno.
Sed mi, por vin prikantadi,
estos de nun pli prodiga
kaŭze de la Am' instiga,
kiu ŝatas plenparadi
oferema, ne pekiga.

Laŭ ĉi sama maniero elpaŝis kaj sin retiris la figuroj de ambaŭ grupoj, kaj ĉiu faris siajn turnojn kaj deklamis sian poemon. El la poemoj, kelkaj estis belaj kaj aliaj ridindaj, sed don Quijote, kiu havis bonan memoron, retenis nur la versojn menciitajn. Poste, la dancantoj miksiĝis, farante kaj rompante siajn rondojn plej gracie, facile kaj gaje, kaj, kiam Cupido pasis antaŭ la kastelo, li pafis alten siajn sagojn, sed la Intereso respondis bombante lin per orkoloraj buloj. Fine, dancinte sufiĉe longan tempon, la Intereso elprenis burson faritan el la stria felo de granda kato, ŝajne plenan de mono, kaj ĵetis ĝin kontraŭ la kastelo, kies tabuloj, kaŭze de la frapo, skuiĝis kaj disfalis, lasante la pucelon neŝirmita kaj sen defendo. La Intereso proksimiĝis al ŝi kun sia grupo, kaj ĵetis ĉirkaŭ ŝian kolon grandan oran ĉenon, kvazaŭ oni kaptus, submetus kaj sklavigus ŝin. Tion vidante, Cupido kaj liaj kompanoj ŝajnigis savi ŝin el la manoj de la Intereso, farante siajn dancajn movojn laŭ la takto de la tamburetoj. La sovaĝuloj interpacigis la du grupojn, rapide remetis kaj denove fiksis la tabulojn de la kastelo, la pucelo enfermis sin en ĝi, kiel antaŭe, kaj per tio finiĝis la danco ĉe la granda plezuro de la spektantoj.

Don Quijote demandis al unu el la nimfoj, ĉu ŝi scias, kiu elpensis kaj aranĝis la spektaklon. Ŝi respondis, ke tion faris unu kleriko de la vilaĝo, tre talenta por tiaj aferoj.

—Mi vetus —diris don Quijote—, ke tiu kleriko aŭ bakalaŭro estas pli granda amiko de Camacho ol de Basilio, kaj ke li eminentas en la satira arto pli ol en la eklezia scienco. Kiel bele li aludis per la spektaklo la sciojn de Basilio kaj la riĉon de Camacho!

Ĉion aŭskultinte, Sancho diris:

—La reĝo estu mia koko.^[279] Mi vetas por Camacho.

—Oni klare vidas, Sancho —respondis don Quijote—, ke vi estas unu el tiuj kampuloj ĉiam dirantaj: Vivu longe la venkinto!

—Mi ne scias kio mi estas —diris Sancho—. Sed mi bone scias, ke el la marmitoj de Basilio neniam mi eltirus tiel elegantan ŝaŭmon, kiel el la ĵaroj de Camacho.

Kaj, tion dirante, li montris al sia mastro la poton plenan de kokinoj kaj anseroj. Poste li prenis unu kokinon kaj komencis manĝi kun granda senĝeno kaj apetito.

—Al la diablo la scioj de Basilio! —li diris—. Homo pli valoras, ju pli da havo li trezoras. Kiel diris avino mia, nur du familioj ekzistas en la mondo: la havanta kaj la ne havanta. Ŝi ĉiam preferis la havantan, kaj en la nuna tempo, mia sinjoro don Quijote, oni pli atentis la havon ol la scion. Azeno kovrita per oro aspektas pli bele ol ĉevalo kun ŝarĝo-selo. Tiel do, mi insistas, ke mi partianiĝas por Camacho, en kies potoj abundas ŝaŭmaj bagateloj kiel anseroj, kokinoj, leporoj kaj kunikloj, dum en la potoj de Basilio apenaŭ oni trovas, se ion, akvecan kaĉon.

—Ĉu vi jam finis vian litanion, Sancho? —demandis don Quijote.

—Mi finas, ĉar mi vidas, ke via moŝto ĉagreniĝas de miaj vortoj —respondis Sancho—. Sed mi havas temon por paroli ankoraŭ dum tri tagoj.

—Dio volu, Sancho, ke mi vidu vin muta, antaŭ ol mi mortos.

—Se konsideri, kiel ni vivas, mi estos jam maĉanta koton, [280] kiam vi mortos; tiam, mi tiel mutos, ke eble mi parolos eĉ ne unu vorton ĝis la fino de la mondo aŭ, almenaŭ, ĝis la tago de la lasta juĝo.

—Eĉ se tiel, Sancho —diris don Quijote—, neniam via silentado egalos al la longo de via parolfluo pasea, nuna kaj futura; des pli, ke, laŭ la leĝoj de la naturo, mi supozas, ke mi mortos antaŭ ol vi, do mi ne havas la esperon vidi vin silenta, eĉ ne, almenaŭ, kiam vi trinkas aŭ dormas.

—Je Dio, sinjoro —respondis Sancho—, oni ne devas fidi la Senkarnan, mi volas diri la Morton, ĉar ĝi tiel devoras la ŝafidon kiel la ŝafon; kaj mi aŭdis nian pastron diri, ke per la samaj paŝoj ĝi iras en la altaj turoj de la reĝoj kaj en la humilaj kabanjoj de kampulo. Ĝi montriĝas pli potenca ol delikata, akceptas kaj devoras ĉion sennaŭze kaj ŝtopas sian sakon per homoj de ĉia aĝo kaj rango. Ĝi estas falĉisto ne dormanta, laboras senĉese kaj falĉas la verdan herbon same kiel la sekan; kaj ŝajnas, ke, anstataŭ maĉi, ĝi glutas kion ajn ĝi trovas antaŭ si, ĉar ĝi havas hundan apetiton kaj neniam satiĝas. Kaj, kvankam ĝi ne havas ventron, ĝi ŝajnas suferi hidropson kaj avidas trinki nur la vivon de la vivantoj, kiel oni trinkas kruĉon da frida akvo.

—Sufiĉe jam, Sancho —interrompis don Quijote—. Haltu en viaj bonaj frazoj kaj ne risku fali. Vere, per viaj rustikaj

esprimoj vi parolas pri la morto tiel trafe kiel bona predikisto. Mi diras, Sancho, ke se via diskreteco egalus al via natura talento, vi povus iri tra la mondo bele predikante de la kirkaj katedroj.

—Kiu bone vivas, bone predikas —respondis Sancho—, kaj mi ne konas alian teologion.

—Vi ne bezonas ĝin —diris don Quijote—. Sed, konsiderante, ke en la timo al Dio troviĝas la komenco de la saĝo, mi ne tute komprenas, kiel vi tiel multe scias, kvankam vi pli timas ajnan lacerton ol Dion.

—Opiniu pri viaj kavaliraĵoj, sinjoro, kaj ne faru al vi la zorgon juĝi alies timon aŭ kuraĝon, ĉar mi sentas tiel respektan timon al Dio kiel la ceteraj personoj. Via moŝto permesu, ke mi manĝu en unu momento ĉi bagatelojn, ĉar ĉio alia konsistas nur el vanaj vortoj, pri kiuj ni respondos en la transa vivo.

Kaj, tion dirinte, li komencis ataki denove sian poton kun tia entuziasmo, ke ĝi vekis la apetiton de don Quijote; kaj sendube lia mastro helpus lin, se ne detenus lin de tio unu evento tuj sekve rakontenda.

[278] Unu el la fabelaj herooj plej popularaj de la kavaliraj romanoj.

[279] Mi staru ĉe la plej potenca. Esprimo prenita el la terminologio de la malnovaj koko-luktoj.

[280] Maĉi koton: kuŝi mortinta.

Ĉapitro 21

Daŭrigo de la edziĝo de Camacho kun aliaj interesaj eventoj

Dum don Quijote kaj Sancho parolis, kiel menciite en la antaŭa ĉapitro, aŭdiĝis laŭtaj voĉoj kaj bruo venantaj de la surĉevalinaj viroj, kiuj krie kaj tumulte galopis renkonte al la gefianĉoj. La geedziĝontojn ĉirkaŭis mil specoj de instrumentoj kaj akompanis la pastro, la membroj de la du familioj kaj la gravuloj de la proksimaj vilaĝoj, ĉiuj en festaj kostumoj. Sancho, vidante la fianĉinon, diris:

—Per la ĉielo, ŝi portas veston, ne de kampulino, sed de eleganta damo de la reĝa palaco! Je Dio, anstataŭ la medaloj kutimaj en ĉi ceremonioj ŝi portas riĉan koral-kolieron, kaj ne verdan drapon el Cuenca, sed plej suplan veluron. Kaj kia falbalo el blanka tolo! Ĉu vere tolo? Mi ĵuras, ke ĝi estas sateno! Kaj rimarku ŝiajn manojn, garnitajn per jadaj ringoj! La diablo min prenu, ne estas jadaj, sed oraj, vere oraj ringoj kun perloj blankaj kiel lakto, ĉiu sendube valoranta unu okulon de la vizaĝo! Ho la putineto! Kaj kiaj haroj! Se ili ne estas falsaj, neniam antaŭe mi vidis tiajn tiel longajn kaj blondajn! Sed kion diri pri ŝia figuro kaj gracio? Ĉu ŝi ne kompareblas al fleksebla palmo ŝarĝita de daktil-grapoloj? Ja, al ili similas la juveloj pendantaj de ŝiaj haroj kaj gorĝo! Mi ĵuras je mia animo, ke ŝi estas brava bubino, vere inda kuŝi en nupta lito!

Don Quijote ridis je la rustikaj laŭdoj de Sancho Panza, sed pensis, ke li neniam antaŭe vidis tiel belan virinon, ne escepti lian sinjorinon Dulcinea de El Toboso.

La bela Quiteria vidiĝis iom pala, eble kaŭze de la mava nokto, kiu ordinare pasas la fianĉinoj, preparante sin por sia sekvantataga nupto. La grupo sin direktis al alta trabaĵo, staranta ĉe angulo de la herbejo kaj ornamita per tapiŝoj kaj branĉoj, kie okazus la edziĝa ceremonio, kaj de kie oni spektus la dancojn kaj amuzojn. Alvenante tien, ili aŭdis post si fortan voĉon kii:

—Atendu momenton, vi, homoj hastaj kaj senkonsideraj!

Ĉe tiaj voĉo kaj vortoj turniĝis ĉies kapoj, kaj oni vidis, ke la krianto estas viro en nigra saĵo kun silkaj pecoj ruĝaj surkruditaj en formo de flamoj. Li havis sur la kapo kronon el folioj de funebra cipreso kaj tenis en la mano grandan bastonon. Kiam li proksimiĝis, ĉiuj rekonis en li bravan Basilio, kaj atendis senspire la sekvojn de liaj voĉoj kaj paroloj, timante, ke lia alveno en ĉi momento alportus nenion bonan.

Li fine alvenis, laca kaj anhela, haltis antaŭ la gefianĉoj, enpikis en la teron la bastonon, kiu havis ŝtalan pinton, kaj poste, kun ŝanĝiĝanta koloro kaj fiksante la rigardon sur Quiteria, diris en trema kaj raŭka tono:

—Vi bone scias, sendanka Quiteria, ke, laŭ la sankta leĝo de ni sekvata, vi ne povas preni al vi alian edzon, dum mi vivas; kaj vi same scias, ke, atendante, ke la tempo kaj miaj klopodoj pligrandigu mian havon, mi ne ĉesis gardi la respekton ŝuldatan al via honoro; sed vi turnis la dorson al via devo reciproki mian ĉastan amon, kaj volas, ke mia apartenaĵon mastru alia persono, kies haveco donas al li nur riĉon, sed ankaŭ feliĉon. Kaj, por ke lia fortune estu plena kaj kompleta (ne ĉar mi pensas, ke li meritas ĝin, sed ĉar plaĉas al la ĉielo lin favori) mi detruos per propra mano la obstaklon, kiu povus oponi al lia feliĉo, formetanta min el via vojo. Vivu, vivu la riĉa Camacho kaj la sendanka Quiteria

dum longaj kaj feliĉaj jaroj! Kaj mortu la povra Basilio, kies mizero detranĉis laflugilojn de lia feliĉo kaj metos lin en la tombon!

Kaj, tion dirante, li ekpremis kaj tiris la bastonon fiksitan al la tero, sed ĝi restis senmova, rivelante, ke ĝi servis kiel ingo de spado; poste li metis sur la grundon kion oni povus nomi la tenilo, kaj rapide kaj kun decida gesto, sin ĵetis kontraŭ la spadon, kies sanga pinto kun duono de la klingo tuj reaperis el lia dorso. La kompatinda falis teren kaj, banata en sango, restis senmova, trapikita de sia propra armilo.

Liaj amikoj, konsternitaj de lia mizera kaj bedaŭrinda misfortuno, tuj alkuris helpi lin. De sia flanko, don Quijote desaltis de Rocinante, rapidis al li, prenis lin en siaj brakoj, kaj rimarkis, ke li spiras ankoraŭ. Oni volis eltiri la spadon el lia korpo, sed la pastro, tie troviĝanta, opiniis, ke ni ne devus fari tion, ĝis li konfes-prenus Basilion, ĉar la eltiro de la spado kaj lia morto okazus samtempe. Tiam Basilio iom renkontiĝis kaj diris kun vea kaj febla voĉo:

—Se vi, kruela Quiteria, bonvolus en ĉi fatala kaj lasta momento, doni al mi edziniĝe vian manon, mi pensus, ke mi temerareco havas ian ekskuzon, ĉar, dank' al ĝi, mi atingus la feliĉon esti via.

Tion aŭdinte la pastro admonis lin zorgi la savon de sia animo prefere ol la plezurojn de la karno, kaj serioze peti de Dio, ke Li pardonu liajn pekojn kaj lian desperan agon. Basilio respondis, ke li tute ne farus sian konfeson, se unue Quiteria ne donus al li sian manon, kaj ke, se ŝi konsentus, lia feliĉo havigus al li la kuraĝon kaj la forton konfesi.

Kiam don Quijote aŭskultis la peton de la vundito, li laŭte kriis, ke lia demando estas justa kaj prudenta, kaj krome, facile plenumbla, kaj sinjoro Camacho, ricevante ŝin kiel

vidvinon de la brava Basilio, honoriĝus tiel multe, kvazaŭ li ŝin ricevus el manoj de ŝiaj gepatroj.

—Ĉi tie —li konkludis— necesas nur, ke oni prononcu unu jes. Kaj tio havos nenian sekvon, ĉar la nupta lito de ĉi edziĝo estos la tombo.

Camacho ĉion aŭdis, kaj ĉio tenis lin en perplekso kaj embaraso, sen ke li sciis kion fari aŭ kion diri; sed tiom multe insistis la amikoj de Basilio, petante lin konsenti tion, ke Quiteria donu edziniĝe sian manon, por ke la animo de Basilio ne damniĝu, forlasante senespere ĉi mondon, ke Camacho cedis al tiom da instigoj kaj premoj kaj diris, ke se Quiteria volus doni sian manon al Basilio, li ne oponus, ĉar la plenumo de liaj deziroj prokrastiĝus nur unu momenton.

Tiam, ĉiuj alkuris al Quiteria, kaj unuj per petoj, aliaj per larmoj kaj aliaj per persvadaj argumentoj, konsilis ŝin doni sian manon al la povra Basilio; sed, pli dura ol marmoro kaj pli senmova ol statuo, ŝi aspektis, kvazaŭ ŝi nek sciis, nek povus, nek volus respondi eĉ unu solan vorton; kaj nenion ŝi respondus, se la pastro ne dirus al ŝi, ke ŝi rapide prenu decidon, ĉar Basilio havas jam la animon ĉe la dentoj, kaj oni ne povas perdi pli da tempo en hezitadoj. Tiam, ankoraŭ muta, la bela Quiteria, afliktita kaj trista, ŝajne plena de konfuzo, proksimiĝis al la loko, kie Basilio, kuŝanta kun senesprimaj okuloj kaj kun spiro anhela kaj rapida, murmuris la nomon de Quiteria kaj ŝajnis preta morti ne kiel kristano, sed kiel pagano. Fine la junulino genuiĝis antaŭ li kaj petis lian manon per signoj. Basilio rigardis ŝin kun elorbiĝantaj okuloj kaj diris:

—Ho Quiteria, vi kompatas min, kiam via kompatato povas taŭgi nur kiel tranĉilo definitive elŝiranta el mi la vivon, ĉar mi ne plu havas forton sufiĉan por elteni la honoron, ke vi elektas min kiel vian, nek por ĉesigi la doloron, kiu tiel

rapide kovras al mi la okulojn per la terura ombro de la morto. Sed mi petas de vi, ho fatala stelo mia, ne ke vi donu al mi vian manon pro kompato, aŭ kun la intenco trompi min denove, sed ke vi konfesu kaj deklaru, ke vi propravole ĝin donas al mi, kiel al laŭleĝa edzo; ĉar ne decas, ke, en mia nuna stato, vi uzu trompon aŭ artifikon kontraŭ la persono, kiu ĉiam traktis vin en vero kaj sincero.

Parolante, li svenis de tempo al tempo, tiel, ke la ĉeestantoj pensis, ke ĉiu sveno prenis kun si lian animon. Quiteria, plena de honto kaj embaraso, prenis per sia dekstra mano la manon de Basilio kaj diris:

—Nenia forto kapablus rompi mian volon. Plej libere mi donas al vi mian manon kiel laŭleĝa edzino, kaj ricevas la vian, se vi ĝin donas al mi propravole, kaj se la misfortuno, kiun vi suferas pro via hasta impulso, ne konfuzis aŭ ŝanĝis vian spiriton.

—Jes, mi donas —respondis Basilio— ne en perplekso kaj konfuzo, sed kun la klara menso al mi donita de la ĉielo. Tiel do, mi min donas kaj ligas al vi kiel vian edzon.

—Kaj mi, kiel vian edzinon —diris Quiteria—, same se vi vivos multe da jaroj, kiel se oni portos vin nun de miaj brakoj al la tombo.

—Se konsideri lian gravan vundon, ĉi junulo parolas tro multe —rimarkis Sancho—. Li metu finon al sia ama babilado, kaj pli zorgu sian animon: ŝajnas al mi, ke li havas ĝin pli proksima al la lango ol al la dentoj.

Dum Quiteria kaj Basilio havis la manojn interkroĉitaj, la pastro, kortuŝita kaj plorema donis sian benon al la paro kaj petis la ĉielon havigi bonan ripozon al la animo de la novedzo. Sed, tuj kiam li ricevis la benon, Basilio rapide

stariĝis kaj kun nekredebla facilo elŝiris la spadon ingitan en lia korpo.

Ĉiuj ĉeestantoj rigidiĝis de miro, kaj kelkaj el ili, pli naivaj ol scivolaj, komencis krei:

—Miraklo, miraklo!

—Miraklo, ne. Nur artifiko! —respondis Basilio.

La pastro, en plena konsterno kaj stuporo, komencis palpi ambaŭmane la vundon kaj trovis, ke la klingo penetris, ne tra la karno kaj ripoj de Basilio, sed tra fera tubo, kiu antaŭe li almetis al si kaj plenigis per sango, tiel preparita, ke ĝi ne povus koaguliĝi, kiel poste oni vidis. Fine la pastro kaj Camacho, same kiel la ceteraj ĉirkaŭstarantoj, sentis sin mokitaj kaj insultitaj. Sed la novedzino montris nenian signon de ĉagreno antaŭ la trompo: kontraŭe, kiam ŝi aŭdis, ke la geedziĝo ne validas pro sia artifika karaktero, ŝi diris, ke ŝi konfirmas ĝin denove. Ĉiuj konkludis el tio, ke Quiteria kaj Basilio interkonsente kaj sekrete antaŭpreparis la aferon, kaj, konsekvence, Camacho kaj liaj partianoj tiel ofendiĝis, ke ili decidis venĝi sin per siaj propraj manoj, kaj multaj el ili eligis la glavojn kaj sin ĵetis kontraŭ Basilio, por kies defendo subite oni elingis preskaŭ la saman nombron da glavoj. Don Quijote, bone kovrita de la ŝildo kaj kun la lanco preta, antaŭigis rajde sur la ĉevalo, igante ĉiujn retropaŝi. Sed Sancho, kiu neniam sentis plaĉon nek plezuron ĉe tiaj konfliktoj, rifuĝis inter la ĵaroj, kie li antaŭe elprenis tiel bongustan ŝaŭmon, ĉar lia dirita loko ŝajnis al li kvazaŭ sanktejo respektenda de ajna luktanto.

—Haltu, sinjoroj, haltu —kriis laŭte don Quijote—. Ne decas, ke vi venĝu vin kontraŭ la ofendoj de la amo. Ne forgesu, ke la amo kaj la milito estas unu sama afero, kaj same kiel en la milito licas ordinare uzi artifikojn kaj ruzojn por venki la

antagoniston, tiel en la rivalecoj kaj konkuradoj amaj pravigeblas la trompoj kaj intrigoj uzatajn por atingi la celon, kondiĉe ke ili ne makulu aŭ damaĝu la honoron de la persono amata. Quiteria apartenas al Basilio, kaj Basilio al Quiteria, dank' al justa kaj favora decido de la ĉielo. Camacho riĉas kaj povas aĉeti sian plezuron kiam, kie kaj kiel li volos. Basilio havas nur ĉi ŝafinon, kaj neniu, kiom ajn potenca li estas, forprenos ŝin de li, ĉar la homo ne povas disigi kion Dio ligis: kaj se iu, tamen, havus la intencon trudi la malon, unue li devus alfronti la pinton de ĉi lanco.

Tion dirinte, don Quijote svingis la lancon tiel lerte kaj energie, ke la homoj ne konantaj lin tute teruriĝis. Kaj tiel intense fiksiĝis la disdegno de Quiteria en la menso de Camacho, ke en unu momento li forviŝis ŝin el sia memoro; do la admonoj de la pastro, viro saĝa kaj bonintenca, des pli facile konvinkis lin, kaj metis lin kaj liajn partianojn en pacan kaj trankvilan staton; por signo de tio, ili denove ingis la glavojn, kritikante Quiterian pro ties ŝanĝiĝemo pli ol Basilion pro ties artifiko. Dume Camacho pensis, ke, se Quiteria profunde amis Basilion en sia fraŭlineco, ŝi, eĉ kiel edzino de alia, plu amus lin; do Camacho konkludis, ke li devus varme danki la ĉielon, ĉar anstataŭ posedi ŝin, li perdis ŝin.

Camacho fine konsoliĝis kaj trankviliĝis, same kiel liaj amikoj. Ankaŭ Basilio kaj ties grupo paciĝis, kaj la riĉa Camacho, dezirante pruvi, ke li sentas neniam rankoron aŭ ĉagrenon pro la moka artifiko, volis, ke oni daŭrigu la feston, kvazaŭ li estus edziĝinta. Sed nek Basilio, nek lia edzino, nek iliaj partianoj volis ĝin ĉeesti kaj revenis al la vilaĝo de Basilio; ĉar ankaŭ la paŭperaj, se virtaj kaj saĝaj, havas ĉiam amikojn, kiuj sekvas, honoras kaj protektas ilin, same kiel al la riĉaj ne mankas akompanantoj kaj flatuloj.

Ili prenis kun si la hidalgon, konsiderante lin homo kuraĝa, kun medolo en la ostoj. Nur Sancho sentis sin plena de nigra aflikto, vidante, ke li tute ne povus partopreni en la superbaj festeno kaj festo de Camacho, daŭrontaj ĝis la nokto; tiel do li sekvis trenpaŝe kaj triste sian sinjoron, distanciĝante de la marmitoj de Egiptujo,^[281] kvankam li portis ilin en sia koro. La ŝaŭmo de la poto, jam preskaŭ tute konsumita, prezentis por li la gloron kaj abundon de la perdita bono; kaj tiel, enpena kaj morna, sed ne malsata, li sekvis, rajde sur la azeno, la paŝojn de Rocinante.

[281] En figura senco: vivo glata kaj sata.

Ĉapitro 22

Kie oni rakontas la grandan aventuron de la kaverno de Montesinos, en la koro de La Mancha, sukcese plenumitan de la kuraĝa don Quijote

La nov-geedzoj bonvole kaj regale tenis ĉe si la hidalgon, montrante tiamaniere sian dankemon pro lia preteco defendi ilin en ties am-afero, kaj konsiderante lin tiel saĝa kiel sentima, ia Cid pro lia kuraĝo, kaj ia Cicerono pro lia elokvento. La bona Sancho vivis tri tagojn kiel kuko en butero je la kosto de la geedzoj, kiuj sciigis, ke la la ideo de Basilio false vundi sin ne estis intrigo antaŭakordita kun Quiteria, kaj ke ĉion li mem kovis sola kun la espero sukcesi, kio efektive okazis, kiel vidite. Tamen li konfesis, ke li sekretis pri sia projekto al kelkaj amikoj, por ke, en la ĝusta momento, ili helpu kaj favoru lian intencon kaj trompon.

—Kion oni projektas por atingi virtan celon, oni ne povas nek devas nomi trompo, kaj la edziĝo de du geamantoj estas la plej nobla aspiro —diris don Quijote.

Tamen li avertis, ke la plej rigora detruanto de la amo estas la malsato kaj la daŭramizero, ke la amo brilas per ĝojo, plezuro kaj feliĉo, des pli se la amanto posedas la personon amatan, kaj ke ĝi havas la paŭperecon kaj la mankon, kiel senkaŝan kaj firman antagoniston. Ĉion ĉi li diris kun la intenco persvadi Basilion, ke li rezignu la praktikadon de siaj artoj, prestiĝaj, sed ne mondonaj, kaj ke li dediĉu sin pligrandigi sian havon per efektiva laboro, ĉiam trovebla de homoj aktivaj kaj prudentaj. Senhavulo honorata (se tia povas ekzisti) posedas trezoron en la persono de bela edzino, kaj se oni ŝin forprenas de li, oni samtempe

forprenas kaj detruas lian honoron. Virino bela kaj virta, kies edzo malriĉas, meritas porti laŭrkronon kaj palmaĵon de venko kaj triumfo. Belulino altiras per si mem la deziron de la viroj, kiuj rigardas kaj admiras ŝin, kaj reĝaj agloj kaj altaflugaj birdegoj ĵetas sin sur ŝin kvazaŭ sur bongustan logaĵon. Sed se ĉi belulino suferas mankon kaj mizeron, tiam ankaŭ korvoj, nizoj kaj aliaj rabobirdoj pafas sin al ŝi, kaj, se ŝi teniĝas firma kaj necedema, ŝi meritas la nomon de krono de ŝia edzo.

—Aŭskultu, prudenta Basilio —aldonis don Quijote—. Mi ne scias kiu saĝulo diris, ke en la tuta mondo ekzistas nur unu bona edzino, kaj li konsilis, ke ĉiu viro pensu kaj kredu, por ke li vivu kontenta, ke tia edzino estas la lia. Kvankam mi ne edziĝis, nek ĝis nun venis al mi en la kapon tia ideo, tamen mi kuraĝus doni konsilon al viro, kiu petus mian opinion pri tio, kian virinon li devus preni kiel edzinon. Unue mi konsilus, ke li konsideru ŝian reputacion pli ol ŝian havon; ĉar virtan virinon oni honoras, ne nur pro ŝia virto, sed ankaŭ se ŝi vidiĝas virta: pli multe damaĝas la honoron de virino ŝia publike frivola kaj libera konduto, ol ŝia sekreta pekado. Se oni prenas al sia hejmo honestan virinon, facilas konservi ŝin tia, kaj eĉ plifirmigi ŝian virton; sed, se oni prenas mavan, multa klopodo necesas por bonigi ŝin, ĉar ne senpene oni pasas de unu ekstremo al la alia, kaj, laŭ mia opinio, tia transformo estas preskaŭ nebla.

Sancho aŭskultis ĉion kaj diris en si:

—Kiam mi parolas pri aferoj substancaj kaj plenaj de medolo, mia mastro ordinare diras, ke mi povus preni kirkan katedron en la mano kaj iri bele prediki tra la mondo. Kaj mi diras pri li, ke, kiam li komencas elbobeni sentencojn kaj konsilojn, li povus preni, ne unu, sed du katedrojn por ĉiu fingro, kaj iri de placo al placo predikante pri io ajn. Je la diablo, kiom da aferoj scias ĉi vaganta kavaliro! Mi pensis, ke li kompetentas

nur rilate al siaj kavaliraĵoj. sed en ĉian kaĉon li volas kaj povas meti sian kuleron.

Sancho murmuris ĉi tion iom laŭte, kaj lia mastro, duonaŭdante lin, demandis:

—Kion vi grumblas, Sancho?

—Mi nek parolas nek grumblas ion —respondis la ŝildisto—. Mi nur diris en mi, ke, antaŭ ol mi edziĝis, mi estus preferinta aŭskulti kion via moŝto ĵus diris. Eble mi dirus nun, ke «bovo libera sin lekas senĝena».

—Ĉu via Teresa tiel multe mavas, Sancho? —demandis don Quijote.

—Ne tre —respondis Sancho—. Sed ŝi ankaŭ ne tre bonas; almenaŭ ne tiom, kiom mi dezirus.

—Vi ne bone kondutas, Sancho, kritikante vian edzinon, la patrinon de viaj filoj.

—Ni ŝuldas nenion unu al la alia —respondis la ŝildisto—. Ankaŭ ŝi kritikis min, kiam ŝi volas, precipe kiam ŝi ĵaluzas: en tiaj momentoj, eĉ Satano mem ne povus ŝin elteni.

Ili gastis tri tagojn ĉe la nov-geedzoj, servate kaj regalate kiel reĝoj. Don Quijote petis de la lerta licenciulo, ke li havigu al li personon, kiu povus gvidi lin al la kaverno de Montesinos, ĉar li tre deziras esplori ĝin kaj vidi per propraj okuloj, ĉu respondas al la vero tiom da mirindaj aferoj rakontataj pri ĝi. La licenciulo respondis, ke li havigos al li unu kuzon sian, faman studenton, tre inklinan al la legado de kavaliraj libroj, kiu volonte kondukus lin ĝis la buŝo de la kaverno kaj montrus al li la lagojn de Ruidera, famajn tra la tuta La Mancha kaj eĉ tra la tuta Hispanujo. La licenciulo

aldonis, ke al don Quijote plaĉus la akompano de lia kuzo, ĉar li scias verki librojn kaj dediĉi ilin al la princoj.

Fine la kuzo prezentiĝis kun graveda azenino, kies ŝarĝo-selon kovris plurkolora tapiŝo aŭ sak-tolo. Sancho harnisis la ĉevalon kaj azenon, provizis sian dusakon, metis apud ĝi la dusakon, ankaŭ bone provizitan, de la kuzo, kaj la grupo, adiaŭante kaj rekomendante sin al Dio, ekiris ale al la fama kaverno de Montesinos.

Survoje don Quijote demandis la kuzon pri la naturo aŭ karaktero de liaj okupoj kaj pri liaj studoj kaj profesio. La kuzo respondis, ke li estas humanisto laŭprofesie, kaj ke lia laboro konsistas en la verkado kaj eventuala eldono de libroj utilaj kaj interesaj por la leganta publiko de la regno. Unu titoliĝis *Pri kostumoj* kaj en ĝi aperis la priskribo de sepcent tri kostumoj kun ties koloroj, insignoj kaj devizoj.^[282] El tia libro la kavaliroj korteganoj povus laŭplaĉe elekti kaj kopii la modelojn plej konvenajn por siaj diversaj festoj kaj celebroy, sen ke ili bezonus prunte peti de iu la kostumojn, aŭ torturi al si la kapon, klopodante trovi veston laŭan al iliaj intencoj kaj deziroj.

—Ĉar —li diris— mi prezentas al la ĵaluza, la forgesita, la disdegnata kaj la forestanta la modelon plej taŭgan al lia stato. Mi havas alian libron titolotan *Metamorfozoj* aŭ *La hispana Ovidio*, kies temo estas kurioza kaj originala, ĉar, parodiante Ovidion, mi rakontas la historion de La Giralda de Sevilla; de El Ángel de La Magdalena; de la kvartalo de Vecinguerra en Córdoba; de la Taŭroj de Guisando; de Sierra Morena; de la fontanoj de Leganitos kaj Lavapiés, En Madrid, sen forgesi la aliajn de El Piojo, El Caño Dorado kaj La Priora. Kaj mi garnas la priskribon per tiom da alegorioj, metaforoj kaj aliaj stilefektoj, ke la libro surprizas, instruas kaj distras en la sama tempo. Alia libro mia titoliĝas *Suplemento al Virgilio Polidoro* kaj temas pri la diversaj inventoj; la verko,

tre dokumentita, plenas de erudicio, ĉar ĝi inkluzivas en agrabla stilo kelke da gravaj aferoj preterlasitaj de Polidoro, [283] kiujn mi poste eltrovis. Virgilio forgesis diri al ni, kiu estis en la mondo la unua homo suferinta kataron, kaj la unua uzinta unĝventon kiel medicinon kontraŭ la franca morbo.[284] Nu, mi rivelas iliajn nomojn literon post litero, apogante min sur la atestoj de dudek kvin aŭtoroj. Via moŝto juĝu do, ĉu mi ne bone laboris, kaj ĉu la libro ne utilos al la tuta mondo.

Sancho, atente aŭskultinte la kuzon, demandis al li:

—Diru, sinjoro (kaj cetere mi deziras al vi bonan sorton, por ke oni eldonu viajn librojn), ĉu vi povus diri (kompreneble vi povos, ĉar vi ĉion scias) la nomon de la unua viro gratinta al si la kapon? Laŭ mia opinio, estis Adamo.

—Jes, tre eble —respondis la kuzo—, ĉar Adamo, la unua homo en la mondo, sendube havis kapon kaj harojn, sekve li devis grati al si la kapon kelkfoje.

—Mi kredas same —diris Sancho—. Sed nun, respondu: kiu estas la unua falinto?

—Vere, frato, mi ne scias ĉi-momente la ĝustan respondon. Mi studos la aferon, kiam mi revenos al miaj libroj, kaj informos vin, kiam ni denove vidos unu la alian, ĉar certe nia nuna renkontiĝo ne estos la lasta.

—Nu, sinjoro, ne faru al vi zorgon, ĉar mi jam trafis la respondon al mia demando —diris Sancho—. La unua falinto en la mondo estas Lucifero, tial, ke, kiam oni lin elpuŝis aŭ elĵetis el la ĉielo, li falruliĝis en la abismon.

—Vi pravas, amiko —diris la kuzo.

—Nek la demando nek la respondo estas viaj —intervenis don Quijote—. Vi aŭdis ilin ie.

—Silentu, sinjoro —respondis Sancho—. Se mi volus demandi kaj respondi, mi ne finus ĝis morgaŭ. Kaj vere, por demandi absurdojn kaj respondi idiotaĵojn, mi ne bezonas ies helpon.

—Vi diris pli, ol vi scias —komentis don Quijote—, ĉar kelkaj ĝislace studas kaj pravas aferojn, kiuj, kiam lernitaj kaj pruvitaj, neniel utilas al la saĝo aŭ al la inteligento.

Per ĉi agrabla babilado, kaj per aliaj similaj, ili pasis la tagon, kaj, por tranokti, loĝiĝis en eta vilaĝo situanta, laŭ diro de la kuzo, ne pli ol ses mejlojn for de la kaverno de Montesinos. Li rimarkigis al la hidalgo, ke se li tenas ankoraŭ la firman decidon penetri en la kavernon, necesus akiri ŝnuron por, per ĝi, helpi lin descendi en la abismon. Don Quijote respondis, ke li volas vidi la fundon, eĉ se por tio li devus sobiri ĝis la infero. Tiel do, ili aĉetis ŝnuron proksimume cent kvindek futojn longan, kaj la sekvantan tagon, je la dua posttagmeze, alvenis al la kaverno, kies buŝo estas larĝa sed kun tiom da licioj, rubusoj, kratagoj kaj sovaĝaj figarboj dense kunkreskintaj, ke ili ĝin tute kovras kaj obstrukcas. La kuzo, Sancho kaj don Quijote deseliĝis, kaj la du unuaj fortege alligis la ŝnuron al la hidalgo.

Kaj dum oni ĉirkaŭvolvis kaj zonis per la ŝnuro la talion de don Quijote, diris Sancho:

—Konsideru kion vi faras, sinjoro. Ne sepultu vin viva, nek eniru tien, kie vi aspektus kiel unu el la boteloj metitaj en la putoj, por ke ili pende fridiĝu. Vere, esplori ĉi truon ne tuŝas nek koncernas vian moŝton. Certe, ĝi pli teruras ol ublieto.

—Ligu min kaj ne parolu —respondis don Quijote—, ĉar ĉi entrepreno, amiko Sancho, al mi estas rezervita.

—Mi petas vian moŝton, sinjoro don Quijote —diris tiam la gvidanto—, ke vi observu kaj ekzameni per cent okuloj la internon de la kaverno; eble vi trovos tie ion, kion mi povus mencii en mia libro de metamorfozoj.

—Lecionoj al profesoro estas vana laboro —sentencis Sancho Panza.

Ĉe tio kaj post ol oni finis ĉirkaŭligi la hidalgon (ne sur la armaĵo, sed sur la saĵo), li diris:

—Ni ne havis la antaŭzorgon provizi nin per ia tintilo, kiu, se ligita al ĉi ŝnuro, apud mi, anoncus per siaj sonoj, ke mi descendas kaj vivas; sed, ĉar tio jam ne eblas, la mano de Dio gvidu min.

Tiam li genuiĝis kaj flustre preĝis al la ĉielo, petante la helpon de Dio kaj bonan sorton en ĉi ŝajne danĝera kaj nekutima aventuro. Poste li laŭtis:

—Ho, mastrino de miaj agoj kaj decidoj, glora kaj senegala Dulcinea de El Toboso! Se bonŝance alvenos al via orelo la suplikoj kaj preĝoj de via feliĉa amanto, bonvolu ilin aŭskulti je la nomo de via nekomparebla belo, ĉar ili humile petas nur, ke vi ne rifuzu al mi vian protektan favoron, nun tiel necesan. Mi tuj ĵetos min, plonĝos kaj descendos en ĉi abismon, ĉe kies faŭko mi staras, nur por ke la mondo sciu, ke, se vi favoras min, ekzistas nenio neebla, kiun mi ne povus entrepreni kaj sukcese fini.

Dirinte tion, li proksimiĝis al la fendego kaj rimarkis, ke nur per la forto de la brakoj aŭ per la hako de la glavo li povus fari al si vojon ĝis la faŭko kaj descendi. Tiel do li elingis sian glavon kaj komencis bati, tranĉi kaj faligi la erikojn, kiuj kreskis ĉe la buŝo de la kaverno; pro la bruego de lia dishakado, nekalkulebla nombro da egaj korvoj kaj monedoj eltorentis tiel dense kaj rapide tra la faŭko, ke ili renversis la

hidalgon sur la teron; kaj se li estus superstiĉa, anstataŭ bona kristano, li konsiderus sian falon mava aŭguro kaj rezignus sian intencon penetri en tian lokon.

fine li stariĝis, ne vidis elflugi pli da korvoj aŭ da aliaj noktaj birdoj, kiaj la vespertoj same elirintaj inter la korvoj, kaj, per la ŝnuro iom post iom ellasata de Sancho kaj la kuzo, li komencis descendi al la fundo de la terura kaverno. Ĉi-momente Sancho sendis al li sian benon kaj diris, farante super li mil kruco-signojn:

—Dio vin gvidu, kaj ankaŭ la Virgino de la Roko de Francujo kaj la Triunuo de Gaeta, ho vi, floro, kremo kaj ŝaŭmo de la vaganta kavalirismo! Antaŭen, bravulo de la mondo, koro el ŝtalo, brakoj el bronzo! Dio vin gvidu kaj rekonduku vin sekura, sana kaj libera en ĉi vivon, kies lumon vi forlasas por sepulti vin en la tenebron, kiun vi serĉas!

La kuzo uzis preskaŭ la saman retorikon kiel Sancho, kaj de sia flanko don Quijote laŭtis, ke oni ellasu pli kaj pli da ŝnuro, kion la kuzo kaj Sancho faris poiome: kaj kiam liaj voĉoj, venantaj el la kaverno kvazaŭ tra tunelo, ne plu aŭdiĝis, la paro ellasis ankoraŭ la ŝnuron ĝis la lastaj futoj kaj fine opiniis, ke ili devus jam hisi la hidalgon tial, ke ili ne havis pli da ŝnuro disponebla. Tamen ili atendis proksimume duonan horon kaj, ĉe la fino de la dirita tempo, komencis suprentiri la ŝnuron; sed ĝi tiel facile kaj senpeze cedis al la ektiroj, ke la kuzo kaj la ŝildisto imagis, ke don Quijote restas en la fundo; kaj, tion kredante, Sancho komencis amare plori, kaj, senpacienca koni la veron, rapidege tiris je la ŝnuro. Sed, kiam ŝajne restis ankoraŭ okdek futoj suprenŝovotaj, la paro eksentis pezon kaj, kun ĝi, grandan ĝojon. Fine, je dek tri futoj ili klare vidis la hidalgon, kaj Sancho laŭtis al li:

—Estu bonvena en via reveno, sinjoro mastro! Ni pensis, ke vi decidis fondi vian familion tie sube!

Sed don Quijote respondis nenion, kaj, kiam oni lin tute eltiris, vidiĝis, ke li havas la okulojn fermitaj, kvazaŭ li dormus. Oni kuŝigis lin sur la teron kaj disligis lin, sed, malgraŭ tio, li ne vekigis. Fine tiel multe oni lin turnis, returnis, movis kaj skuis, ke post iom longa tempo li rekonsciiĝis sin streĉante, kvazaŭ li vekigis el profunda kaj peza dormo. Poste li rigardis mirokule al ĉiu flanko kaj diris:

—Dio vin pardonu, amikoj, tial, ke vi forprenis de mi la plej plaĉan kaj agrablan vivon kaj vizon, kian ĝis nun neniu homo ĝuis en la mondo. Mi nun vere komprenas, ke la plezuroj de ĉi vivo pasas kiel ombro aŭ sonĝo, aŭ velkas kiel floro kampa. Ho, povra Montesinos! Ho, grave vundita Durandarte! Ho, senfortuna Belerma! Ho, plorema Guadiana, kaj vi, kompatindaj filinoj de Ruidera, kies akvoj formiĝis el la larmoj de viaj belaj okuloj!

Sancho kaj la kuzo aŭskultis kun granda atento la hidalgon, kies vortoj ŝajnis dolorege elŝiriĝi el lia sino. Ili petis lin klarigi kion do li volas diri kaj kion li vidis en tiu infero.

—Ĉu infero? Ne nomu ĝin infero. Tian nomon ĝi ne meritas, kiel vi tuj vidos.

Li petis ion por manĝi, ĉar li tre malsatis. Do ili sternis la saktolon de la kuzo sur la verda herbo, helpis al si per la viktualio de siaj dusakoj, sidiĝis, kaj en harmonia kaj frateca rondo, konsumis en la sama tempo la kolazionon kaj la vespermanĝon. Fine oni demetis la saktolon kaj tiam diris don Quijote de La Mancha:

—Neniu leviĝu, filoj, kaj atente aŭskultu.

[282] En la turniroj kaj en aliaj konkursoj kaj festoj, la kavaliroj aperis en kostumoj, kies koloroj kaj insignoj ĝenerale rivelis la staton de iliaj amaj sentoj. Por ekzemplo, la verda koloro indikis esperon, la blua ĵaluzon, la flava desperon.

[283] Polidoro Virgilio. Itala aŭtoro de la 15-a jarcento, verkis la traktaton *De rerum inventoribus*.

[284] Iama nomo de la sifiliso.

Ĉapitro 23

Pri la mirindaj aferoj rimarkitaj de la senegala don Quijote, laŭ lia aserto, en la profunda kaverno de Montesinos, sed tiel enormaj kaj neeblaj, ke ĉi aventuron oni rigardas apokrifa

Estis proksimume la kvara posttagmeze, kiam la suno, vualita de la nuboj, verŝis feblan lumon per apenaŭ varmaj radioj, donante al don Quijote la okazon rakonti al siaj du eminentaj aŭskultantoj, sen la ĝeno de la laciga varmo, kion li vidis en la kaverno de Montesinos. Kaj li komencis jene:

—Proksimume dek ok aŭ dudek futojn sube, en la profundo de ĉi ublieto, ĉe la dekstra flanko, troviĝas konkava spaco kapabla enteni grandan ĉaron kun ties muloj. Ioma lumo penetras en ĝin de tre fore tra kelkaj fendoj aŭ truoj irantaj ĝis la surfaco de la tero. Ĉi konkavan spacon mi vidis, kiam, laca kaj ĉagrenita pendi de la ŝnuro, mi descendadis tra tiu nigra regiono, sen sekvi difinitan aŭ konkretan vojon. Tiel do, mi decidis halti en la dirita spaco kaj iom ripozi. Mi laŭtis al vi, petante, ke vi ne ellasu pli da ŝnuro, ĝis mi sciigus vin denove, sed certe vi ne aŭdis min. Tiam, mi kunkolektis la ŝnuron, laŭmezure kiel vi sendadis ĝin, faris per ĝi volvaĵon, sidiĝis sur ĝi kaj, profunde enpenisa, cerbumis kion mi devus fari por atingi la fundon, konsiderante, ke mi ne povus plu descendi retenate. En ĉi perpleksa meditado, mi falis subite kaj senvole en profundan dormon kaj, plej neatendite, sen scii kiel aŭ kial, mi vekiĝis meze de la plej bela, agrabla kaj delica herbejo iam naskita de la naturo aŭ imagita de la plej fantazio homa.

»Mi apertis la okulojn, frotis ilin, konstatis, ke mi ne dormas, kaj ke vere mi statas vekita. Tamen mi palpis mian kapon kaj mian bruston por certigi al mi, ĉu tie troviĝas mi en persono, aŭ fantomo vana kaj misforma. Sed la tuŝo, la sento, kaj ankaŭ tio, ke mi kohere rezonis, pruvis al mi, ke mi troviĝis tie sube, same kiel nun mi troviĝas ĉi tie supre. Baldaŭ aperis antaŭ miaj okuloj impona palaco aŭ alkazaro reĝa, kies remparoj kaj muroj ŝajnis el travideble klara kristalo. Tiam apertiĝis pordego, kaj tra ĝi eliris ale al mi respektinda oldulo en longa robo el viola serĝo trenanta sur la tero; speco de studenta pelerino el verda veluro kovris al li la ŝultrojn kaj la bruston; sur la kapo li havis nigran Milanan ĉapon, kaj lia barbo, tre griza, longis ĝis sub lia talio. Li portis nenian armon, sed en lia mano vidiĝis rozario kun bidoj pli grandaj ol nuksoj, kaj ĉiu deka bido grandis kiel struta ovo. Lia teniĝo, lia paŝado, lia solena kaj impona mieno kaŭzis al mi miron kaj admiron, tiel per ĉiu detalo, kiel per la tuto. Li proksimiĝis al mi, brakumis min kaj poste diris:

»—Jam de tre longe, ho sentima kavaliro don Quijote de La Mancha, ni atendis vin en ĉi solecaj kaj ensorĉitaj lokoj, por ke, poste, vi povu informi al la mondo pri tio, kion enfermas kaj kovras ĉi profunda kaverno, kien vi penetris, nomata kaverno de Montesinos: la plenumo de tia heroaĵo estis rezervita nur al via nevenkebla koro kaj al via senegala kuraĝo. Akompanu min, glora sinjoro; mi deziras montri al vi kiom da kaŝitaj mirindaĵoj troviĝas en ĉi diafana alkazaro, kies ĉefo kaj ĉiama gardanto estis mi, Montesinos mem, kiun nomon prenis ankaŭ ĉi kaverno».

»Apenaŭ li diris, ke li estas Montesinos, mi demandis al li, ĉu veras la rakonto cirkulanta en ĉi supra mondo, nome, ke li elŝiris per eta dago^[285] la koron el la brusto de sia granda amiko Durandarte kaj portis ĝin al sinjorino Belerma, kiel petis de li Durandarte mem ĉe la rando de la morto.

Montesinos respondis, ke ĉio veras, krom la dago, ĉar ĝi estis nek dago nek eta, sed tre akra ponardo pli pinta ol aleno.

—Sendube ĝin faris Ramón de Hoces, el Sevillano —diris Sancho.

—Mi ne scias —respondis don Quijote—. Sed certe ne estis Ramón de Hoces ĝia farinto ĉar li apartenas al nia epoko, kaj la batalo de Roncesvalles, kie okazis la menciita tragedio, plenumiĝis antaŭ multe da jaroj. Cetere ĉi detalo nek gravas nek modifas aŭ ŝanĝas la veron kaj la signifon de la historio.

—Vi pravas —diris la kuzo—. Daŭrigu, sinjoro don Quijote. Mi aŭskultas vian rakonton kun la plej granda plezuro de la mondo.

—Ne malpli plezure mi ĝin diras —respondis don Quijote—. Nu, la respektinda Montesinos kondukis min en la kristalan palacon, kie en ia basa salono, eksterordinare friska kaj tute alabastra, staris marmora tombo-monumento majstre ĉizita, sur kies supro kuŝis laŭ sia tuta longo kavaliro ne el bronzo, marmoro aŭ jaspo, materialoj ordinare uzataj por tiaj tomboj, sed el vera karno kaj el veraj ostoj. Lia dekstra mano, kiu ŝajnis al mi forta kaj iom tro vila, signoj de granda potenco, teniĝis sur la koro. Kaj Montesinos, vidante min miri je la kuŝanta figuro, diris al mi, antaŭ ol mi demandus ion:

»—Ĉi homo estas mia amiko Durandarte, floro kaj spegulo de la kuraĝaj kaj enamiĝintaj kavaliroj de sia epoko. Merlín, la franca sorĉisto, laŭdire filo de la diablo, tenas lin ensorĉita, kaj same min kaj multe da aliaj kavaliroj kaj damoj. Sed mi kredas, ne ke li estas filo de la diablo, sed ke li scias iom pli ol la diablo mem. Oni tute ne konas, kiel aŭ kial li ensorĉis nin, kvankam la futuro tion klarigos, supozeble post ne longe. Sed plej mirigas min, ke mi estas certa (kiel certa mi estas ke nun ni havas sunan tagon) ke Durandarte finis sian

vivon inter miaj brakoj, kaj ke, kiam li mortis, mi elŝiris lian koron per miaj propraj manoj; sendube ĝi pezis du funtojn, ĉar, laŭ la sciuloj, ju pli grandas la koro, des pli da kuraĝo havas ĝia posedanto. Se tiel do, se vere ĉi kavaliro mortis, kial li veas kaj ĝemas nun de tempo al tempo, kvazaŭ li vivus?

»Ĉi-momente la povra Durandarte laŭtis:

Ho vi, kuzo Montesinos!
Jen la lasta peto mia:
kiam mi mortinta kuŝos,
nura korpo senanima,
mian koron portu tien,
kie ŝi, Belerma, vivas,
post ol vi el mi ĝin ŝiros
por ponard' aŭ dago pika.^[286]

»Tion aŭdinte, la respektinda Montesinos genuiĝis antaŭ la afliktita figuro kaj diris kun larmoj en la okuloj:

»—Antaŭ longe, sinjoro Durandarte, karega kuzo, antaŭ longe, mi faris kion vi ordonis al mi en la amara tago de nia malvenko: mi elŝiris vian koron, tiel bone kiel mi povis, sen ke restus en via brusto eĉ ne parteto el ĝi; mi viŝis ĝin per punta mantuko, rapidis kun ĝi al Francujo, post ol mi metis vin en la sinon de la tero verŝante tiom da larmoj, ke ili lavis de mi la sangon, per kies koloro antaŭe makuliĝis miaj manoj fosintaj en via internaĵo. Kaj, por ke vi pli konvinkiĝu, kara kuzo, sciu, ke ekirinte de Roncesvalles, en la unua vilaĝo ĉe la vojo mi ŝutis iom da salo sur vian koron, por ke ĝi ne stinku, kaj alvenu, se ne freŝa, almenaŭ peklita antaŭ sinjorino Belerma. La saĝulo Merlín jam de longe tenas ŝin ensorcita, same kiel min, vin, vian ŝildiston, la duenjon Ruidera kun ties sep filinoj kaj du nevinoj, kaj multe da aliaj amikoj kaj konatoj viaj; kaj, kvankam jam pasis kvincent

jaroj, eĉ ne unu el ni mortis; mankas nur Ruidera kaj ties filinoj kaj nevinoj, tial, ke ili ne ĉesis plori, kaj Merlín, eble movata de kompato, transformis ilin en la saman nombron de lagoj nun konataj en la mondo de la vivantoj, kaj en la provinco de La Mancha, sub la nomo «lagoj de Ruidera». La sep lagoj apartenas al la reĝoj de Hispanujo, kaj la du nevinoj al kavaliroj de la tre pia ordeno de Sankta Johano. Ankaŭ Guadiana, via ŝildisto, priploris vian tristan sorton, kaj oni aliigis lin en la riveron nomatan kiel li. Sed, kiam ĉi rivero atingis la surfacon de la tero kaj vidis la sunon de la alia ĉielo, tiel multe ĝi afliktiĝis, vidante, ke ĝi distanciĝis de vi, ke ĝi denove refluis en la profundon de la tero. Tamen ne eblas al ĝi ĉesi flui laŭ sia natura kurso, do ĝi emerĝas de tempo al tempo kaj montriĝas kie la suno kaj la homoj povas ĝin vidi. La supre menciitaj lagoj provizas ĝin per sia akvo, kaj kun ĉi akvo, kaj multaj aliaj, ĝi enfluas, pompa kaj granda, en Portugalujon. Sed, malgraŭ ĉio, laŭlonge de sia iro, ĝi evidentigas sian triston kaj melankolion, kaj penas bredi en sia akvo, ne valorajn kaj delikatajn fiŝojn, sed sengustajn kaj krudaformajn, tre diferencajn de la fiŝoj de la ora Tajo. Kion mi diras nun al vi, ho kara kuzo, mi jam diris al vi multe da fojoj. Sed tial, ke vi ne respondas, mi pensas, aŭ ke vi ne aŭskultas, aŭ ke vi ne kredas min. Kaj tio, Dio scias, ege min afliktas. Tamen mi deziras komuniki al vi ion novan, kiu eble ne mildigos vian doloron, sed ankaŭ ne intensigos ĝin. Apertu la okulojn kaj vidu per vi mem, ke ĉi tie, antaŭ vi, staras la granda kavaliro, pri kiu la saĝa Merlín profetis tiom da aferoj: jen don Quijote de La Mancha, restaŭranto kaj pliboniganto, en la nuna epoko, de la olda kaj jam forgesita kavalirismo. Kaj eble per lia favoro kaj interveno oni elsorĉos nin, ĉar la grandaj faroj rezerviĝas al grandaj viroj.

»—Kaj se oni ne sukcesus? —respondis la afliktita Durandarte kun vea kaj febla voĉo—. Se oni ne sukcesus, ho kuzo, tiam ni devus «pacienci kaj la karto-ludon rekomenci».

[287]

»Kaj turnante sin sur unu flankon, li refalis en sian kutiman silenton kaj ne diris eĉ unu plian vorton.

»Ĉe tio aŭdiĝis kriegoj kaj veoj akompanataj de profundaj ĝemoj kaj angoraj plorsingultoj. Mi turnis la kapon kaj rimarkis tra la kristalaj muroj, ke en alia salono paŝas procesio formita de du vicoj de belegaj puceloj en funebro, kun blankaj turbanoj turkstilaj sur la kapo. Ĉe la fino de la vicoj iris sinjorino —almenaŭ ŝi ŝajnis tion pro sia serioze digna aspekto— same en funebro, kun blankaj vualoj tiel longaj, ke ili treniĝis sur la tero. Ŝia turbano estis duoble pli granda ol la turbanoj de la aliaj virinoj; ŝiaj brovoj tre proksimis inter si, kaj ŝia nazo iom platis; ŝi havis la buŝon granda, sed kun ruĝaj lipoj; la dentoj, kiam ŝi ilin montris, vidiĝis disaj kaj miskreskintaj, sed blankaj kiel senŝelaj migdaloj; ŝi tenis en la manoj delikatan tolon, inter kies faldoj, kiom mi povis distingi, kuŝis koro ŝajne mumia, se konsideri ties ekstreme sekan kaj ŝrumpan aspekton.

»Montesinos diris al mi, ke la homoj de la procesio estas servistinoj de Durandarte kaj Belerma, ensorcĉitaj same kiel iliaj mastroj; ke la lasta virino mane portanta koron inter la faldoj de la tolo estas sinjorino Belerma; ke ŝi procesias tiel kvar tagojn semajne kun siaj ĉambristinoj, kantante, aŭ pli ĝuste, ĝemante elegiojn super la korpo kaj super la povra koro de sia kuzo; kaj ke, se ŝi ŝajnis al mi iom turpa, aŭ ne tiel bela kiel la famo proklamas, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ŝi trapasas en sia ensorcĉiteco multe da mavaj noktoj, kaj eĉ da pli mavaj tagoj, kiel montras ŝiaj forte bluringitaj okuloj kaj la malsaneca flavo de ŝia haŭto.

»—Je tiaj bluringoj kaj flavo —li aldonis— kulpas, ne la monata sang-el fluo propra al la virinoj —ĉar jam de multaj monatoj, kaj eĉ de multaj jaroj, ŝi ne havas ĝin, nek ĝi montriĝas ĉe ŝiaj pordoj— sed ŝia doloro enkora, kiun kaŭzas al ŝi la alia koro konstante tenata de ŝiaj manoj kaj

konstante memoriganta al ŝi la tragikan finon de ŝia senfortuna amanto; alie, apenaŭ egalus al ŝi, rilate al belo, gracio kaj spirito, la granda Dulcinea de El Toboso, tiel fama en ĉi regionoj kaj eĉ en la tuta mondo.

»—Ne konkludu tiel rapide, sinjoro don Montesinos —mi diris tiam—. Rakontu vian historion, kiel decas, ĉar vi scias, ke ĉiaj komparoj estas abomenaj, do oni ne bezonas kompari personon kun persono. La senegala Dulcinea de El Toboso estas, kia ŝi estas, kaj sinjorino doña Belerma estas, kia ŝi estas kaj estis... kaj punkto.

»—Sinjoro don Quijote, pardonu min. Mi konfesas, ke mi ne faris bone, dirante, ke sinjorino Dulcinea apenaŭ egalus al sinjorino Belerma. Mi sciis, dank' al ia intuo, ke via moŝto estas ŝia kavaliro, do tio devus sufiĉi al mi, por ke mi mordu al mi la langon, anstataŭ kompari ŝin kun io alia, se ne kun la ĉielo.

»Per ĉi ekskuzoj de la granda Montesinos, mia koro trankviliĝis de la ŝoko, kiun mi ricevis, kiam li komparis mian sinjorinon kun Berlema.

—Kaj mi tre miras —diris Sancho—, ke vi ne saltis sur la olduleton por trakalcitri al li la ostojn kaj elŝiri lian barbon ĝis la lasta haro.

—Ne, amiko Sancho —respondis don Quijote—. Mi ne rajtas tion, ĉar ni havas la devon respekti ĉian oldulon, precipe se li estas kavaliro kaj krome ensorĉito. Sed en la aliaj multaj demandoj kaj respondoj de nia konversacio ĉio iris glate inter mi kaj li.

—Mi ne komprenas, sinjoro don Quijote —diris tiam la kuzo —, kiel via moŝto vidis tiom da aferoj kaj aŭskultis kaj parolis tiel multe, se konsideri, ke via restado en la kaverno estis kurta.

—Antaŭ kiom da tempo mi descendis? —demandis don Quijote.

—Antaŭ iom pli ol unu horo —respondis Sancho.

—Tio ne eblas —respondis don Quijote— ĉar, tie sube, la nokto kaj la mateno trafis min trifoje, do, laŭ mia kalkulo, mi restis tri tagojn en tiuj foraj regionoj kaŝitaj al la homa rigardo.

—Certe mia sinjoro pravas —diris Sancho—. Ĉio okazas al li pere de ensorĉoj, sekve, kio al ni ŝajnas unu horo, tio eble egalas al tri tagoj kun ties noktoj tie sube.

—Tre eble —respondis don Quijote.

—Ĉu via moŝto manĝis en la menciita tempo? —demandis la kuzo.

—Eĉ ne unu plenbuŝon —respondis don Quijote—. Kaj ankaŭ ne sentis malsaton.

—Ĉu la ensorĉitoj dormas? —demandis la kuzo.

—Ne —respondis don Quijote—. Almenaŭ en la tri tagoj trapasitaj de mi kun ili, nenies okuloj fermiĝis. Ankaŭ mi ne dormis.

—Bone aplikiĝus al ĉi kazo la proverbo «Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas» —diris Sancho—. Se via moŝto kutime iras kun ensorĉitoj fastantaj kaj ne dormantaj, ne mirinde, ke ilia akompano ankaŭ vi nek manĝas nek dormas. Sed pardonu min, sinjoro mastro, kaj Dio prenu min kun si (ne la diablo, kiel mi preskaŭ diris) se mi konfesas, ke mi kredas nenion el via rakonto.

—Kial ne? —demandis la kuzo—. Ĉu vi kredas, ke don Quijote povus mensogi? Eĉ se li volus, li ne havus tempon sufiĉan por elpensi kaj komponi tian milionon da fikcioj.

—Mi ne kredas, ke mia sinjoro mensogas —respondis Sancho.

—Kion vi kredas, do? —demandis don Quijote.

—Mi kredas —diris Sancho—, ke, kion vi rakontis ĝis nun, kaj kion ceteran vi rakontos, enbatis en vian cerbon kaj imagon la saĝa Merlín aŭ la magiistoj ensorcintaj la bandon, kiun, laŭ vi, vi vidis kaj alparolis tie sube.

—Tio, kvankam ebla, ne okazis —respondis don Quijote—, ĉar mi vidis per miaj propraj okuloj kaj tuŝis per miaj propraj manoj kion mi rakontis. Sed, kion vi opinios, se mi aldonas, ke inter la nenombreblaj mirindaĵoj al mi montritaj de Montesinos (pri ili mi rakontos al vi detale en nia vojaĝo, ĉar ne ĉiuj oportunas al la nuna momento) troviĝis tri kampulinoj, kiuj cervice saltis kaj kapriolis tra ravaj kampoj? Tuj mi rekonis en unu el ili la senegalan Dulcinea de El Toboso, kaj en la du aliaj la saman paron da kampulinoj, kiuj akompanis ŝin, kiam ni renkontis ŝin survoje, proksime al El Toboso. Mi demandis al Montesinos, ĉu li konas ilin; li respondis, ke ne, sed ke, laŭ lia opinio, sendube temas pri tri grandaj damoj ensorcitaj; ke antaŭ nur kelke da tagoj ili aperis sur la herbejoj, kaj ke mi ne devus miri je tio, ĉar multaj aliaj sinjorinoj de la pasintaj kaj nunaj epokoj troviĝas tie transformitaj en plej diversajn figurojn. Kaj, inter ili, li konis la reĝinon Ginevra kaj ties duenjon Quintañoa, kiuj verŝis vinon por Lanceloto alveninta de Britujo.

Aŭdante tion, Sancho pensis, ke li, aŭ perdos la saĝon, aŭ mortos de rido. Ĉar li sciis la veron rilate al la supozata ensorcado de Dulcinea, tial, ke li estis ĝia aŭtoro kaj ĝia sola

atestanto, li fine konvinkiĝis, sen ia dubo, ke lia mastro absolute perdis la racion kaj estas freneza de la kapo ĝis la piedoj. Li do diris:

—En mava tempo, en pli mava okazo kaj en fatala tago sobiris via moŝto al la alia mondo, kaj en missorta momento vi renkontis sinjoron Montesinos, tial, ke li tiel ŝanĝis vin. Vi bone fartis ĉi tie supre, kun via tuta saĝo, kian Dio donis al vi, kaj vi bele konsilis kaj sentencis ĉiumomente, anstataŭ rakonti, kiel nun, tiom da neimageblaj absurdoj.

—Ĉar mi konas vin, Sancho, mi ne atentis viajn vortojn — respondis don Quijote.

—Same mi ne atentis la viajn —diris Sancho—, eĉ se vi batos aŭ mortigos min kaŭze de miaj opinioj, aŭ kaŭze de tio, kion mi plu diros, se vi ne volas korekti viajn proprajn vortojn. Sed diru nun, kiam regas ankoraŭ la paco inter ni: kiel, aŭ per kio, via moŝto rekonis nian sinjorinon Dulcinea? Kaj, se vi parolis al ŝi, kion vi diris, kaj kion ŝi respondis?

—Mi rekonis ŝin —respondis don Quijote— ĉar ŝi portis la saman veston, kiel en la tago, kiam vi montris ŝin al mi. Mi alparolis ŝin, sed, anstataŭ respondi, ŝi turnis al mi la dorson kaj forkuris tiel rapide, ke eĉ ne unu sago atingus ŝin. Mi volis sekvi ŝin, sed Montesinos min konsilis rezigni la persekutadon, unue ĉar ĝi tute vanus, kaj precipe, ĉar jam baldaŭ sonus la horo de mia reveno el la kaverno. Li aldonis, ke iam en la futuro oni informus min pri kiel li, Belerma, Durandarte kaj la ceteraj personoj tie troviĝantaj devus esti elsorĉitaj. Sed el ĉio, kion mi vidis kaj rimarkis, plej afliktis min, ke, kiam Montesinos parolis al mi ĉi aferojn, unu el la du akompanantinoj de la senfortuna Dulcinea proksimiĝis al mia flanko, sen ke mi vidus ŝin veni, kaj kun la okuloj plenaj de larmoj, diris al mi en febla kaj vea tono:

»—Mia sinjorino Dulcinea de El Toboso kisas la manon de via moŝto kaj suplikas vin, ke vi informu ŝin, pere de mi, kiel vi fartas; kaj tial, ke ŝi troviĝas ĉi-momente en granda mona embaraso, ŝi same suplikas plej insiste, ke vi bonvolu prunti al ŝi ses realojn, aŭ kiom ajn vi povus, prenante kiel garantion la jenan novan jupon el kotono. Ŝi promesas, ke ŝi redonos plej baldaŭ la prunton al vi.

»Ĉe tia komisio mi miris kaj perpleksis kaj, turnante min al sinjorino Montesinos, demandis:

»—Ĉu eblas, sinjoro Montesinos, ke la ĉefaj ensorcĉitoj suferas tiajn bezonojn?

»—Kredu, sinjoro don Quijote de La Mancha —li respondis—, ke tiu speco de bezono ĉie troviĝas, etendiĝas al ĉiuj lokoj, trafas ĉian personon kaj indulgas eĉ ne la ensorcĉitojn; kaj se sinjorino Dulcinea de El Toboso sendis por ses realoj kaj la garantio estas laŭŝajne bona, prefere pruntu ilin, ĉar sendube ŝi troviĝas en granda embaraso.

»—La garantion mi ne prenos —mi respondis—, nek povas doni al ŝi kion ŝi petas, ĉar mi havas nur kvar realojn.

»Mi donis ilin al ŝi (la samajn kvar realojn, kiujn vi, Sancho, donis al mi antaŭ kelkaj tagoj, ke mi helpu per ili la almozulojn renkontotajn sur la vojo) dirante:

»—Estimata amikino, informu vian sinjorinon, ke mi sentas en la koro profundan aflikton pro ŝia embarasa situacio, kaj ke mi volus esti ia Fúcar^[288] por eltiri ŝin el ĝi. Diru al ŝi ankaŭ, ke mi, nek povas, nek devas havi bonan sanon, tial, ke mankas al mi ŝia agrabla kompanio kaj ŝia saĝa babilado, kaj ke mi petas ŝin plej insiste, ke ŝi permesu, ke ĉi sklava kaj vojo-laca kavaliro ŝia renkontu kaj alparolu ŝin. Informu al ŝi ankaŭ, ke en la plej neatendita momento ŝi aŭdos, ke

mi faris ĵuron kaj voton similan al la ĵuro kaj voto farita de la markizo de Mantuo, kiam ĉi lasta decidis venĝi sian nevon Baldovinos, kiun li trovis mortanta meze de la montoj; per tia ĵuro li devigis sin manĝi nenion el primetitaj tabloj, kaj abstini de kelkaj aliaj bagateloj, ĝis li venĝus lin. Same mi ĵuros ripozi neniam, kaj, eĉ pli diligente ol la infanto don Pedro de Portugalujo, vagadi tra la sep partoj de la mondo, ĝis mi elsorĉos ŝin.

»—Ĉion ĉi, kaj eĉ pli, ŝuldas via moŝto al mia sinjorino — respondis la pucelo.

»Kaj preninte la kvar realojn, ŝi faris, ne riverencon, sed kapriolon, kiu levis ŝin kvin futojn en la aeron.

—Sankta Dio! —interrompis Sancho per tre laŭta voĉo—. Ĉu eblas, ke ekzistas tiaj aferoj en la mondo, kaj ke ensorĉoj kaj ensorĉistoj havas forton sufiĉan por ŝanĝi la prudenton de mia sinjoro al tiel absurda frenezo? Ho sinjoro! Sinjoro! Konsideru vin mem kaj vian honoron, je Dio, kaj ne plu atentu la idiotaĵojn, kiuj ŝancelis kaj renversis vian racion.

—Vi parolas tiel, Sancho, ĉar vi amas min —diris don Quijote—. Kaj tial, ke vi ne havas sperton pri la aferoj de ĉi mondo, ĉio montranta ajnan komplikon ŝajnas al vi neebla. Sed, kiel dirite, siatempe mi rakontos al vi kelke da aferoj rimarkitaj de mi tie sube; kaj ili igos vin kredi mian rakonton, kies vero estas absoluta kaj nediskutebla.

[285] Neologismo. Hispane «daga»; france «dague»; angle «dagger». Speco de kurta glavo aŭ longa ponardo.

[286] Cervantes miksas ĉi tie versojn de du diversaj romanoj, kaj ĉe la fino aldonas du liniojn, kiujn li elpensis.

[287] Proverbo uzata por konsolo de la misfortaj en la kartoludoj, kaj, larĝasence, de la personoj suferantaj ajnan kontraŭaĵon.

[288] Proverba frazo uzata en la epoko de Cervantes por indiki riĉon kaj oferemon. Fúcar aŭ Fugger estis nobela familio de germanaj bankieroj, kiu havis financajn rilatojn kun Hispanujo.

Ĉapitro 24

Kie oni rakontas milon da bagateloj tiel absurdaj kiel necesaj por la vera kompreno de ĉi granda historio

La tradukinto de ĉi granda historio, kies originalon verkis ĝia unua aŭtoro Cide Hamete Benengeli, diras, ke, kiam li atingis la ĉapitron pri la aventuro de la kaverno de Montesinos, li trovis ĉi vortojn, skribitajn de la propra mano de Hamete en la marĝeno:

«Mi ne povas kompreni, nek kredi, ke ĉio rakontita en la antaŭa ĉapitro vere okazis al la kuraĝa don Quijote: la motivo kuŝas en tio, ke liaj ĝisnunaj aventuroj estis fareblaj kaj verŝajnaj; sed mi povas neniel akcepti ĉi aventuron de la kaverno, ĉar ĝi transpasas ĉian limon racian. Tamen, ne eblas pensi, ke don Quijote, la plej ver-ama kaj nobla kavaliro de sia tempo, mensogis, se konsideri, ke li ne dirus unu solan mensogon, eĉ se oni lin trapikus per sagoj. Aliflanke necesas rimarki, ke li rakontis ĉi aventuron kun ties plej etaj detaloj, kaj ke en tiel kurta tempo li ne povus konstrui tiel grandan amason da ekstravagancoj. Kaj se ĉi aventuro ŝajnas apokrifa, mi ne kulpas; do, mi ĝin skribas sen opinii ĝin vera aŭ falsa. Vi, leganto, ĉar prudenta, juĝu laŭ via kriterio, ĉar mi nek povas, nek devas plu paroli. Tamen, don Quijote malkonfesis ĉi aventuron en sia mortolito, dirante, ke li inventis ĝin, ĉar ŝajnis al li, ke ĝi bone konformas kaj respondas al la aventuroj, kiujn li legis en siaj libroj».

Poste, la aŭtoro daŭrigis, dirante:

«La kuzo tiel miris je la aŭdaco de Sancho, kiel je la pacienco de lia mastro, kaj konkludis, ke la serena anim-

stato de don Quijote fontis de lia kontento esti vidinta, kvankam ensorĉita, sian sinjorinon Dulcinea de El Toboso. Alie, Sancho sendube ricevintus, pro siaj vortoj kaj argumentoj, pluvon da batoj sur la ripoj. Kaj ŝajnis al la kuzo, ke, vere, la ŝildisto iom tro impertinentis kontraŭ sia sinjoro. La kuzo turnis sin tiam al la hidalgo kaj diris:

—Sinjoro don Quijote de La Mancha, mi konsideras profitega ĉi vojaĝon kun via moŝto, ĉar per ĝi mi gajnis kvar aferojn. Unue, mi konatiĝis kun vi, kion mi opinias granda feliĉo; due, mi scias pri la sekreto de ĉi kaverno de Montesinos kaj pri la metamorfozoj de Guadiana kaj de la filinoj de Ruidera, kio utilos por la libro *Hispana Ovidio*, kiun mi nun verkas. Trie, riveliĝis al mi la antikveco de la lud-kartoj, jam uzataj en la tempo de la imperiestro Karolo la Granda, kiel oni deduktas de la vortoj diritaj de Durandarte, kiam, laŭ via aserto, ĉe la fino de la longa parolado de Montesinos, li vekigis kaj diris: «Pacienci kaj la karto-ludon rekomenci». Certe li lernis ĉi esprimon aŭ proverbon ne sub ensorĉo, sed antaŭe, en Francujo kaj en la epoko de la menciita imperiestro Karolo la Granda. Nu, ĉi eltrovo estas kvazaŭ farita laŭmezure por mia alia libro, nuntempe verkata, *Suplemento al Virgilio Polidoro, pri la inventoj de la antikva epoko*. Mi kredas, ke, en sia libro, Polidoro forgesis paroli pri la origino de la lud-kartoj, sed mi ne forgesos ĉi gravan informon, des pli, ke mi povos citi tiel seriozan kaj fidindan fonton, kia estas sinjoro Durandarte. Kvare, mi scias kun certeco, kie originas la rivero Guadiana, afero ĝis nun nekonata.

—Via moŝto pravas —diris don Quijote—. Sed mi dezirus scii, al kiu do vi pensas dediĉi viajn verkojn, en la supozo, ke vi havos la ŝancon ricevi la permeson ilin eldoni (kion mi dubas).

—Nu, en Hispanujo ekzistas grandsinjoroj kaj moŝtuloj, al kiuj oni povas fari tian omaĝon.

—Ne multaj —respondis don Quijote—. Kompreneble, ili meritas la omaĝon, sed ne ŝatas akcepti ĝin por eviti al si la kvazaŭdevon iel rekompenci la aŭtoron pro ties laboro kaj ĝentilo. Sed mi konas moŝtulon,^[289] kiu scias kompensi per tiom da favoroj la retenigemon de la aliaj, ke, se mi kuraĝus menciigi lian grandanimecon, eble mi vekus la envion ĉe pli ol kvar oferemaj koroj. Sed ni traktu ĉi aferon en alia momento pli konvena, kaj ni iru serĉi lokon, kie ni povos pasigi la nokton.

—Ne fore de ĉi tie —diris la kuzo— staras ermitejo, kie vivas unu ermito, laŭdire ekssoldato. Kuras la famo, ke li estas bona kristano kaj, krome, saĝa kaj karitata. Apud la ermitejo li konstruis al si etan domon, tamen ne tiel etan, ke ĝi ne povus ricevi gastojn.

—Ĉu eble la ermito tenas kokinejon? —demandis Sancho.

—Ermitoj sen kokinejo apenaŭ troviĝas —respondis don Quijote—. La nunaj ermitoj ne similas al la vivintaj en la egiptaj dezertoj, kie ili sin vestis per palmaj folioj kaj manĝis radikojn el la tero. Kaj oni ne pensu, ke parolante laŭde pri la antikvaj ermitoj, mi kritikis la aktualajn. Mi volas diri nur, ke hodiaŭ la pentofaroj ne egalas al la rigoro kaj aŭstero observataj en la pasintaj tempoj. Tamen, ili ĉiuj estas bonaj ermitoj. Almenaŭ mi opinias ilin bonaj; kaj, se konsideri ĉion, hipokritulo, kiu simulas boni faras malpli da damaĝo ol publika pekanto.

Ĉe tio ili vidis, ke proksimiĝas surpiede rapid-ira viro, vergante mulon ŝarĝitan per lancoj kaj halebardoj. Fine li atingis ilin, salutis kaj komencis preterpasi.

—Haltu, amiko! —diris don Quijote—. Ŝajnas, ke vi iras pli rapide ol via mulo dezirus.

—Mi ne povas halti, sinjoro —respondis la viro—. Ĉi armiloj ĉi tie videblaj devas esti uzataj morgaŭ, do, nepras, ke mi urĝu. Adiaŭ. Sed, se vi volas scii, kial mi ilin portas, mi intencas tranokti en la gastejo troviĝanta preter la ermitejo. Kaj se vi sekvas la saman vojon, vi trovos min tie, kaj mi rakontos al vi ion vere mirigan. Kaj denove adiaŭ.

Kaj tiel energie li instigis la mulon, ke don Quijote ne havis tempon sufiĉan por demandi al li pri la mirindaĵo rakontota; kaj tial, ke li havis scivoleman naturon kaj ĉiam deziris koni novajn aferojn, li ordonis, ke oni tuj ekiru por tranokti en la gastejo, sen halti ĉe la ermito, kie la kuzo pli volonte restus.

Tiel do, la tri surĉevaliĝis rekte al la gastejo, kien ili alvenis iom antaŭ la noktiĝo. Pli frue, sur la vojo, la kuzo proponis al don Quijote halti momenton ĉe la ermito por trinki unu glason. Sancho Panza, apenaŭ aŭdis lin, irigis la azenon ale al la menciita loko, kaj same faris don Quijote kaj la kuzo; sed ŝajnis, kvazaŭ la mava sorto de Sancho intervenus, ĉar la ermito forestis, kiel informis ilin unu ermitino troviĝanta tie.^[290] Ili petis de ŝi vinon, bonan vinon; la alia respondis, ke ŝia mastro ne havas tian, kaj ke, se ili dezirus akvon ordinaran, tre volonte ŝi donus ĝin al ili.

—Se mi dezirus akvon —respondis Sancho— mi estus ĝin trinkinta el ajna puto ĉe la vojo. Ho, edziĝo de Camacho kaj abundo de la domo de don Diego, kiel ofte mi sentas vian mankon!

Ili forlasis do la ermitejon, ekspronis ale al la gastejo kaj, iom poste, distingis antaŭ si knabon piedirantan tiel senurĝe, ke baldaŭ ili lin atingis. Li portis surŝultre glavon kun ligaĵo ĉe la klingo; ŝajne la ligaĵo entenis kelke da vestopecoj, eble

kuloton, manteleton kaj ĉemizon, ĉar li portis sur la korpo sajon veluran, kun iuj partoj elfrotitaj, kaj longan ĉemizon libere pendantan. Liaj ŝtrumpoj estis silkaj, kaj la ŝuoj larĝapintaj,^[291] laŭ la modo de la kortego. Li havis dek ok aŭ dek naŭ jarojn, gajan vizaĝon kaj, ŝajne, viglan korpon. Por distri sin de la irado, li kantadis *seguidillas*.^[292] Kiam ili atingis lin, li ĵus finis kanton, kies du lastajn liniojn retenis la kuzo en sia memoro:

Puŝas min al batal-kampoj la mizero;
sed, kun mono, mi ne irus, jen la vero.

Don Quijote alparolis lin la unua, dirante:

—Via moŝto vojaĝas iom tro senvesta, sinjoro elegantulo. Kaj kien vi iras? Diru al ni, se vi bonvolas.

—Mi iras al la milito, kaj vojaĝas tiel senvesta pro la varmo kaj pro la mizero.

—Pro la varmo, eble, Sed, kial pro la mizero? —demandis don Quijote.

—Sinjoro —respondis la knabo—. En la ligaĵo mi portas kuloton veluran, t.e. la komplementon de ĉi sajo; se mi tro uzus ĝin sur la vojo, mi ne povus surmeti ĝin en la urbo, kaj cetero mankas al mi mono por aĉeti novan. Pro tio, kaj ankaŭ tial, ke mi deziras teni min freŝa, mi vojaĝas ĉi-maniere ĝis la loko, kie troviĝas kelkaj infanteriaj kompanioj, proksimume kvardek mejlojn for. Tie mi soldatiĝos, kaj, certe, de tie ne mankos armeaj ĉaroj por veturi per ili ĝis la haveno, kie ni enŝipiĝos, laŭdire en Cartagena. Kaj mi preferas havi reĝon, kiel mastron kaj sinjoron, kaj servi lin en la milito, ol dungi min al senmonulo en la ĉefurbo.

—Ĉu eble via moŝto ĝuas monhelpon?^[293] —demandis la kuzo.

—Se mi estus servinta ajnan hispanan grandulon aŭ eminentulon —respondis la knabo— certe mi ĝin ricevus, ĉar, servante ĉe gravaj personoj, oni gajnas rekompencojn; sed mi, kompatinda, ĉiam servis al aventuristoj kaj ofico-ĉasantoj, kies salajroj kaj porcioj tiel mizeris kaj magris,^[294] ke, por pagi la ameladon de kolumo, ili konsumis la duonon de sian enspezoj. Kaj estus vera miraklo, se paĝio de aventuristo havus eĉ nur iom da bona sorto.

—Diru, sincere, amiko —demandis don Quijote—. Ĉu eblas, ke en viaj jaroj de servado, vi ne povis akiri eĉ unu livreon?

—Mi ricevis du —respondis la paĝio—. Sed, same kiel oni prenas la frokon de monaĥo forlasanta la klostron sen fari siajn votojn, kaj oni redonas al li lian propran veston, tiel same miaj mastroj redonis al mi la mian. Ĉar, fininte la aferojn, por kies pritrakto ili alvenis al la ĉefurbo, ili prenis la livreon, donitan al mi nur pro parademo, kaj reiris al sia loĝoloko.

—Notinda *spilorceria*,^[295] kiel diras la italoj —rimarkis don Quijote. —Sed, malgraŭ ĉio, konsideru vin bonsorta, ke vi forlasis la ĉefurbon kun tiel laŭdinda intenco. Nenio ekzistas sur la tero pli honora aŭ profita ol servi unue al Dio kaj poste al la reĝo, nia natura sinjoro, precipe en la profesio de la armoj, ĉar per ili oni atingas, se ne pli da riĉo, almenaŭ pli da honoro ol per la letroj, kiel mi jam diris multe da fojoj. Kvankam la letroj kreis pli da famuloj ol la armoj, tamen la soldato superas la letrulon per io nedifinebla kaj disradias specialan brilon, kiu elstarigas lin super la ceteraj personoj. Bone memoru kion mi tuj diros, ĉar ĝi donos al vi grandan profiton kaj konsolon en viaj klopodoj: formetu de via kapo ĉian penson pri eventualaj misfortunoj, ĉar, kvankam el ili

plej mavas la morto, tamen ĝi plej bonas, kiam oni mortas kun honoro. Iam oni demandis al Julio Cezaro, la kuraĝa imperiestro Romana, kian morton li opinias plej bona. Li respondis, ke la neatendita, neantaŭvidita kaj subita. Kaj, kvankam li respondis kiel pagano senscia pri la vera Dio, tamen li donis trafan respondon, ĉar tia morto kaŭzas al sia viktimo nenian doloron. Ni supozu, ke en la unua eskirmo aŭ batalo oni mortis pro kanona kuglo aŭ pro la eksplodo de mino. Ĉu tio gravas? La morto venis subite kaj ĉio ja finiĝis. Laŭ Terencio, la bona soldato pli bone aspektas mortinta en la batalo ol viva kaj sekura en la forkuro; kaj ju pli li obeemas al sia kapitano kaj ceteraj superuloj, des pli kreskas lia reputacio. Memoru, filo, ke pli decas al soldato odori je pulvo ol je cibeto, kaj ke, se vi oldiĝos en ĉi digna profesio, eĉ se vundoplena, kripla aŭ lama, vi atingos altan aĝon almenaŭ ne sen honoro, tia honoro, ke eĉ ne la paŭpereco povas ĝin ŝanceli. Krome, oni jam komencas fari studojn kaj proponojn por la prizorgo kaj subteno de la soldatoj oldaj kaj kriplaj: ĉar ne decas, ke oni traktu ilin kiel la negrojn, kies mastroj ilin liberigas, kiam ili oldas kaj ne povas plu labori; kaj, ĵetante ilin el la domo kun la titolo de liberaj, oni ilin sklavigas al la malsato, el kies manoj nur la morto ilin liberigos. Nunmomente, mi ne plu parolos. Mi diru nur, ke vi rajdu sur la grupo de mia ĉevalo, ĝis ni atingos la gastejon. Tie vi vespermanĝos kun ni, kaj morgaŭ daŭrigu vian vojaĝon. Kaj mi deziras, ke Dio vin protektu tiel multe, kiel viaj projektoj meritas.

La paĝio rifuzis rajdi sur la grupo, sed akceptis la inviton manĝi en la gastejo kun don Quijote. Laŭdire, Sancho murmuris al si ĉi-momente:

—Kia mastro, je Dio! Ĉu eblas, ke viro kapabla diri, kiel nun, tiom da bonaj kaj saĝaj aferoj, povas aserti, ke li vidis tiel grandan nombron da neblaj absurdoj en la kaverno de Montesinos? Nu, ĉio klariĝos siatempe.

Ili alvenis al la gastejo ĉe la nokto-falo, kaj Sancho tre ĝojis, vidante, ke lia mastro prenis ĝin por vera gastejo, ne por kastelo kiel ordinare. Apenaŭ ili eniris, don Quijote demandis al la gastejestro pri la viro kun la lancoj kaj halebaroj, kaj la alia respondis, ke li troviĝas en la stalo, prilokante tie sian mulon. Ankaŭ la kuzo kaj Sancho aranĝis tie lokon por siaj rajdbestoj kaj donis al Rocinante la plej bonan angulon kaj la plej bonan kripon de la stalo.

[289] Cervantes aludas la grafon de Lemos, kaj ties larĝe rekompenceman spiriton. Kiel sciante, Cervantes dediĉis al li la duan parton de *Don Quijote*. En ĉi sama alineo, la aŭtoro lerte kaj diskrete aludas ankaŭ la avaron kaj sendankecon de la duko de Béjar, grandulo al kiu Cervantes dediĉis la unuan parton de sia romano.

[290] En la epoko de Cervantes abundis la ermitoj, fakte friponoj, kiuj eĉ havis virinojn, «ermitinojn», je sia servo.

[291] La duko de Lerma, favorito de la reĝo Filipo la 3-a, uzis larĝa-pintajn ŝuojn pro siaj kaloj. Baldaŭ tiaj ŝuoj enmodiĝis en la kortego.

[292] Hispane: popolaj danco kaj kanto.

[293] Aludo al pensio aŭ alia tipo de subvencio pagata de la reĝa trezoro al personoj farintaj servon al la krono.

[294] Al kelkaj personoj oni pagis la salajron kaj per mono kaj per porcioj de nutraĵoj.

[295] Itale: «avaremo», «nedonemo».

Ĉapitro 25

Kie oni komencas la aventuron de la azenbleko kaj la amuzan historion de la marionetisto, kune kun la notindaj divenoj de la saĝa simio

Don Quijote sidis sur pingloj, kiel oni diras, atendente la momenton aŭskulti kaj scii la mirindaĵon promesitan de la viro de la halebardoj. Tiel do, la hidalgo iris serĉi lin al la loko indikita de la gastejestro, renkontis lin kaj petis, ke li bonvolu rakonti kion li promesis pli frue sur la vojo.

—La rakonton de ĉi mirindaĵo oni devas aŭskulti kun sufiĉa tempo kaj ne stare —respondis la viro—. Permesu, kara sinjoro, ke mi finu doni furaĝon al mia mulo, kaj mi diros al vi ion vere mirigan.

—Tio ne retenu vin. Mi helpos vin ĉiel ajn.

Efektive, don Quijote kribris la hordeon kaj purigis la kripon, kaj tia humilo movis la alian pli volonte cedi al la peto de la hidalgo. Tiel do, li sidiĝis apud don Quijote sur ŝtona benko, kaj antaŭ la kuzo, la paĝio, la gastejestro kaj Sancho kiel senato aŭ aŭdantaro, komencis la rakonton jene:

—Sciu, sinjoroj, ke, en vilaĝo dek kvar mejlojn for de ĉi tie, unu magistratano perdis sian azenon, kaŭze de ruza trompo plenumita de juna servistino lia (necesus tro da tempo por rakonti ĉi apartan epizodon), kaj, kvankam la magistratano faris ĉion eblan por trovi la beston, li ne sukcesis. Jam de proksimume dek kvin tagoj mankis la azeno, laŭ ĝenerala kaj publika opinio, kiam la magistratanon, kiu troviĝis en la placo, alparolis alia kolego de la sama vilaĝo, dirante:

»—Gratulu min, kompano; via azeno jam aperis.

»—Mi vin gratulas plej kore, sed, kie ĝi aperis?

»—Ĉi-matene mi vidis ĝin en la mondo —respondis la alia— sen ŝarĝo-selo kaj harniso, kaj tiel skeleta, ke ĝi prezentis kompatindan aspekton. Mi volis alpeli ĝin al vi, sed ĝi kondutas nun tiel sovaĝe kaj apartiĝeme, ke, kiam mi proksimiĝis, ĝi forkuris en la denson de la monto. Se vi deziras, ke ankaŭ mi iru serĉi ĝin, permesu, ke mi prenu hejmen ĉi azeninon; baldaŭ mi revenos.

»—Vi faras al mi grandan favoron, kaj mi klopodos pagi vin en simila maniero —diris la perdinto.

»La konantoj de ĉi aventuro rakontas ĝin same kiel mi, kaj kun ties tutaj detaloj. Nu, la du magistratanoj iris piede al la monto kaj, alveninte al la loko, kie ili esperis trovi la azenon, ili vidis ĝin nek tie, nek ie ajn en la ĉirkaŭo, malgraŭ ke ili longe serĉis. Vidante do, ke la azeno ne aperas, la magistratano vidinta ĝin pli frue, diris al la alia:

»—Aŭskultu, kompano, ĵus venis al mi en la kapon unu ideo, kiu, sendube, kondukos vin trovi la azenon, eĉ se ĝi estus kaŝita, ne en la monto, sed en la interno de la tero. Mi scipovas iai ege bone, kaj se ĉi-rilate ankaŭ vi havas ioman sperton, tiam ni nepre sukcesos.

»—Ĉu vi diras «ioman sperton», kompano? Je Dio, neniu min superas, eĉ ne la azenoj mem.

»—Nun ni vidos —respondis la dua magistratano—. Mia ideo estas, ke vi traesploru sur unu flanko de la monto, kaj mi sur la alia, ĝis ni ĉirkaŭos la tuton; dum la iro vi iaos de tempo al tempo, mi faros same, kaj la azeno, se ĝi troviĝas en la monto, nepre aŭdos nin kaj iaos responde.

»—Kompano, via ideo estas tre bona kaj inda je via granda talento —diris la mastro de la azeno.

»Tiel do, kiel interkonsentite, ili disiris; sed okazis, ke la du iais preskaŭ de la sama momento, kaj ĉiu, trompita de la iao de la kunulo, serĉis lin, kredante, ke la azeno jam rivelis sian ĉeeston. Kaj kiam ili vidis denove unu la alian, diris la mastro de la besto:

»—Ĉu eblas, kompano, ke ne mia azeno iais?

»—Iais mi— respondis la alia.

»—Vere, mi konfesas nun —diris la mastro—, ke inter vi kaj unu azeno ekzistas nenio diferenco koncerne la blekadon. En mia tuta vivo mi vidis aŭ aŭdis nenion tiel perfektan.

»—Tian laŭdon kaj komplimenton vi meritas pli ĝuste ol mi, kompano —respondis la iniciatinto de la plano—. Ĉar mi ĵuras je Dio, nia Kreinto, ke en konkurso de azenblekoj, vi povus trankvile doni la avantaĝon de du iaoj al la plej bona kaj lerta blekanto de la mondo. Vi havas la tonon alta, la notoj sekvas sin laŭ ĝusta kadenco, kaj la moduloj estas multaj kaj rapidaj. Resume, mi konfesas min venkita kaj donas al vi la laŭron kaj la kronon de ĉi rara scio.

»—De nun do —respondis la mastro de azeno—, mi estimos kaj konsideros min pli ol antaŭe, kaj agnoskos, ke mi posedas ne ordinaran lerton; ĉar, kvankam mi sciis, ke mi bone iaas, tamen mi neniam supozis, ke mi faras tion, tiel perfekte kiel vi diras.

»—Kaj mi diras ankaŭ —aldonis la alia magistratano—, ke en la mondo ekzistas personoj kun kapabloj raraj, sed vanaj aŭ misuzataj, ĉar ili ne scias eltiri profiton el sia talento.

»—Nia speciala talento —respondis la mastro— nur en okazo kiel la nuna povas taŭgi al ni; kaj Dio volu, ke almenaŭ ĉi tie ĝi montriĝu utila.

»Tion dirinte, ili denove disiĝis kaj iais, sed ĉiumomente trompiĝis kaj renkontiĝis, ĝis fine ili interkonsentis, ke du sinsekvaj iaoj estu la signalo, ke ili mem blekas, ne la azeno. Tiel do, elpuŝante duoblajn iaojn ili ĉirkaŭiris la tutan monton, sen ke la perdita besto respondus eĉ per signoj. Sed, kiel povus respondi la kompatinda kaj missorta besto, se konsideri, ke ili trovis ĝin devorita de lupoj en la plej densa parto de la monto? Vidante ĝin, ĝia mastro diris:

»—Ege min surprizis ĝia silento, ĉar ĝi, se viva, aŭ blekus responde, aŭ ne estus azeno; sed tial, ke mi aŭdis vin iai tiel bele, mi ne bedaŭras mian penadon serĉi ĝin, malgraŭ ke mi trovis ĝin morta.

»—Via estas la honoro, kompano! —respondis la alia—. Ĉar, bele kantas la abato, sed egalas lin la meso-knabo.

»Nu, la paro, raŭka kaj afliktita, revenis al sia vilaĝo, rakontis al siaj amikoj, najbaroj kaj konatoj ĉion pri la serĉado de la azeno kaj emfaze laŭdis reciproke sian lerton en la iaado-arto. La historio disfamiĝis, atingis ĝis la ĉirkaŭaj vilaĝoj, kaj la diablo, ĉiam sendorma kaj inklina ĉie semi diskordon kaj kverelon, farante el muso elefanton kaj el nenio egan ĥimeron, ordonis, ke la homoj de la aliaj lokoj, vidante personon de nia vilaĝo, tuj komencu iai, kvazaŭ ili ĵetus al ni en la vizaĝon la iaojn de niaj magistratanoj. La knaboj entuziasme sin donis al ĉi ŝerco, kaj tiam ŝajnis kvazaŭ ĉiuj demonoj de la infero partoprenus en la amuzo, ĉar la iaoj famiĝis de loko al loko, kaj sekve la loĝantoj de nia vilaĝo estas tiel konataj kaj facile distingeblaj, kiel la negroj de la blankuloj. Kaj ĝis tia ekstremo oni puŝis ĉi mizeran ŝercon, ke multe da fojoj la mokatoj, armitaj kaj en batala formacio,

eliris ataki la mokantojn, sen ke la reĝo aŭ la Turo, la timo aŭ la honto havus forton sufiĉan por eviti tion.

»Mi kredas, ke, morgaŭ aŭ postmorgaŭ, la viroj de mia vilaĝo, t.e. la blekantoj, lanĉos atakon kontraŭ alia vilaĝo, kie oni plej senkonsidere nin persekutas, proksimume ses mejlojn for; kaj por bone prepari nin, mi aĉetis ĉi lancojn kaj halebardojn. Kaj jen, ĉi tie finiĝas la historio pri la mirindaĵo, kiun mi promesis diri; kaj se ĝi ne ŝajnas al vi mirinda, mi ne konas alian pli bonan.

La bonulo finis tiel sian rakonton, kaj tiam eniris tra la pordo de la gastejo viro tute en ĉama ledο: botoj, kuloto kaj saĵo, kriante:

—Sinjoro gastejestro, ĉu vi havas ĉambron por mi? Mi venas kun la divenanta simio kaj kun la trupo de marionetoj, kiuj ludas *La liberigon de Melisendra*.

—Grandioze! —ekkriis la gastejestro—. Jen majstro Pedro! Ni havos tre agrablan nokton.

Mi forgesis diri, ke ĉi majstro Pedro havis la livan okulon, kaj preskaŭ la duonon de la vango, kovrita per peco el verda tafto, kio supozigis la ekziston de ia damaĝo en tiu flanko de lia vizaĝo.

—Bonvenon, sinjoro majstro Pedro! —daŭrigis la gastejestro—. Kie estas la simio kaj la pupoj? Mi ne vidas ilin.

—Ili troviĝas proksime —respondis la viro en ĉama ledο—. Mi antaŭiĝis por vidi, ĉu mi havos ĉambron.

—Eĉ al la duko de Alba mi rifuzus ĉambron por cedi ĝin al sinjoro majstro Pedro —diris la gastejestro—. Alportu la simion kaj la pupojn; ĉi-nokte gastas ĉi tie homoj, kiuj pagos

por vidi la prezentadon kaj ankaŭ por admiri la talenton de la simio.

—Volonte —respondis la viro kun la verda tafto—. Mi reduktos la prezon kaj konsideros min bone pagita, se mi kovros la koston de mia loĝado. Nun mi foriras kaj revenos kun la ĉaro, kie troviĝas la simio kaj la pupteatro.

Tuj poste li eliris el la gastejo, kaj don Quijote demandis al la gastejestro, kiu do estas ĉi majstro Pedro, kaj kian simion kaj teatron li portas kun si.

—Majstro Pedro —respondis la alia— estas fama marionetisto jam delonge rondiranta ĉi regionon de La Mancha de Aragón kun la pup-teatro, kie li prezentas la liberigon de Melisendra fare de la fama don Gaiferos, historio el la plej belaj kaj bone ludataj, kian jam delonge oni ne vidis en ĉi regiono. Li portas kun si ankaŭ unu simion, kiu posedas la plej grandan talenton troveblan inter la simioj aŭ imageblan de la homoj: ĉar, se oni faras al ĝi demandon, ĝi aŭskultas atente, saltas sur la ŝultron de sia mastro, flustras al li en la orelon la respondon, kaj majstro Pedro tuj ripetas ĝin. Pri la pasintaj aferoj ĝi parolas pli multe ol pri la futuraj; kaj, kvankam ĝi eraras kelkfoje, preskaŭ ĉiam ĝi donas la ĝustan respondon, kio igas nin kredi, ke ĝi havas la diablon en la korpo. Majstro Pedro postulas du realojn por ĉiu demando, se la simio respondas, mi volas diri, se ĝia mastro voĉigas kion la simio flustris al li antaŭe en la orelon. Oni kredas, ke ĉi majstro Pedro ege riĉas. Li estas *galant'uomo*, kiel diras la italoj, vera bonulo, kaj ĝuas la plej glatan kaj molan vivon de la mondo: parolas pli ol ses personoj kune kaj trinkas pli ol dudek, ĉio dank' al lia lango, al la simio kaj al la marionetoj.

Ĉi-momente revenis majstro Pedro kun la ĉaro, kie sidis la pupteatro kaj same la simio, granda kaj senvosta, kun la

pugo aspra kiel felto, sed kun ne turpa vizaĝo. Don Quijote, apenaŭ vidis ĝin, demandis al ĝi:

—Diru, sinjoro divenisto: kio okazos? Kio estos al ni? Kaj jen, vidu miajn du realojn.

Kaj li ordonis al Sancho, ke li transdonu ilin al majstro Pedro. Sed ĉi lasta respondis anstataŭ la simio, dirante:

—Sinjoro, ĉi besto ne donas respondon pri la venontaj aferoj. Ĝi iom scias pri la pasintaj, same kiel pri la nunaj.

—Je Dio! —ekkriis Sancho—. Eĉ ne unu soldon mi pagus, por ke oni diru kion mi travivis, ĉar, kiu povus scii tion pli bone ol mi? Kaj estus vere stulte pagi, por ke oni diru al mi kion mi jam scias. Sed tial, ke ĝi konas la nunon, jen miaj du realoj. Diru, linda simio, kion faras ĉi-momente mia edzino Teresa Panza kaj per kion sin distras?

Majstro Pedro rifuzis la monon kaj diris:

—Mi ne volas ricevi pagon sen antaŭe plenumi la servon.

Per la dekstra mano, li donis al si du frapojn sur la livan ŝultron, la simio alsaltis sur ĝin, metis sian buŝon ĉe lia orelo kaj rapide klakis per la dentoj; kaj, tion farinte en apenaŭ la tempo necesa por diri unu *credo*, ĝi saltis denove al la planko. Tuj poste majstro Pedro hastis genuiĝi antaŭ don Quijote, ĉirkaŭprenis liajn krurojn kaj diris:

—Mi brakumas ĉi krurojn, kvazaŭ ili estus la du kolonoj de Herkuleso, ho glora restaŭranto de la jam forgesita vaganta kavalirismo! Ho, neniam sufiĉe laŭdata kavaliro don Quijote de La Mancha, defendo de la afliktitoj, apogo de la falantoj, subteno de la falintoj, bastono kaj konsolo de la mizeruloj!

Ĉe tio don Quijote rigidiĝis de stuporo, Sancho de konfuzo, la kuzo de miro, la paĝio de perplekso, la viro de la iaoj de surprizo, la gastejestro de konsterno, kaj, resume, ĉiuj aŭskultintoj de la vortoj de la marionetisto gapegis senmovaj. Majstro Pedro daŭrigis:

—Kaj vi, ho brava Sancho Panza, la plej bona ŝildisto de la mondo, servisto de la plej bona kavaliro, ĝoju: via bona edzino, Teresa, bone fartas, kaj la nuna horo, kardas funton da lino kaj, jen pli da detaloj, havas ĉe sia liva flanko kruĉon kun la buŝo breĉetita kaj kun ne eta kvanto da vino, kiu animas ŝin en ŝia laboro.

—Mi kredas vin —respondis Sancho—, ĉar ŝi estas vera juvelo, kaj se ŝi ne havus ĵaluzan naturon, mi ne ŝanĝus ŝin eĉ por la gigantino Andandona, virino virta kaj diligenta, laŭ mia mastro. Teresa estas unu el tiuj personoj, kiuj rifuzas al si nenion, eĉ se la herodontoj suferos la konsekvencon de tia konduto.

—Mi diras nun —rimarkis don Quijote—, ke multe leganta kaj vojaĝanta homo vidas multon kaj lernas multon. Nenian argumentadon oni povintus uzi por konvinki min, ke ekzistas en la mondo simioj kun la kapablo diveni, kiel mi vidas nun propra-okule. Efektive, sinjoroj, mi estas la sama don Quijote menciita de ĉi bona besto, kvankam ĝi dediĉis al mi iom tro da laŭdoj. Sed, kia ajn mi estas, mi dankas la ĉielon, ke ĝi donas al mi mildan kaj kompateman naturon, ĉiam pretan fari bonon kaj nekapablan kaŭzi damaĝon al ajna persono.

—Se mi havus monon —diris la paĝio— mi demandus al la sinjoro simio, kio okazos al mi en mia vojaĝo.

Al tio respondis majstro Pedro, jam leviĝinta de la piedoj de don Quijote:

—Mi jam diris, ke ĉi besteto ne divenas la futuron. Alie, mi ne konsiderus vian mankon de mono, ĉar, por komplezi sinjoron don Quijote, mi ignorus ĉian profiton de ĉi mondo. Kaj nun, por amuzi lin, ĉar mi estas ŝulda al li, mi muntos la pupo-teatron kaj donos senpagan prezentadon al ĉiuj personoj de la gastejo.

Tion aŭdinte, la gastejestro, plena de ĝojo, indikis la lokon, kie oni povus munti la teatron kaj, en unu momento, oni ĝin starigis. De sia flanko, don Quijote ne tre kontentis je la diven-kapablo de la simio, ĉar ne ŝajnis al li dece, ke iu simio povu diveni pri aferoj pasintaj kaj futuraj. Tiel do, dum majstro Pedro aranĝis la teatron, don Quijote retiriĝis kun Sancho al angulo de la stalo, kie, neaŭdate de aliaj personoj, li diris:

—Nu, Sancho, mi bone konsideris la raran kapablon de ĉi simio kaj venis al la konkludo, ke ĉi majstro Pedro, ĝia mastro, sendube faris pakton, implicitan aŭ eksplicitan, kun la diablo.

—Se la pako estas implikita^[296] kaj demona, ĝi certe ne rekomendindas. Sed, kian profiton povas eltiri majstro Pedro el ĉi pako?

—Vi ne komprenas min, Sancho —respondis don Quijote—. Mi volas diri, ke li certe interkonsentis kun la diablo, ke ĉi lasta donu al la simio tiel specialan talenton; majstro Pedro gajnas per ĝi sian panon kaj, kiam li riĉiĝos, li devos liveri sian animon al Satano, ĉar tion postulas ĉiam ĉi malamiko de la tuta mondo. Mi tiel opinias, ĉar la simio respondas nur al demandoj pri aferoj nunaj aŭ pasintaj, kaj la scio de la diablo ne etendiĝas pretere. La futuron li povas koni nur per konjektoj, kaj ne ĉiam, ĉar sole Dio rezervis al si la konon de ĉia tempo kaj epoko;^[297] por Li ekzistas nek paseo nek futuro: ĉio estas nuno por Li. Tiel do, tute klaras, ke ĉi simio

parolas laŭ la stilo de la diablo, kaj mi miras, ke oni ne denuncis ĝin ĉe la Sankta Inkvizicio, kie oni ĝin pridemandus kaj elŝirus el ĝi la konfeson pri tio, kiu do havigis al ĝi la kapablon diveni. Evidentas, ke ĉi simio ne estas astrologo, kaj nek ĝi, nek ĝia mastro faras, aŭ scias fari, horoskopojn, kvankam ĉi lastaj tiel enmodiĝis en Hispanujo, ke nuntempe ne ekzistas virineto, paĝio aŭ ŝuflikisto, kiu ne pretus starigi ies horoskopojn (kvazaŭ fari ilin tiel facilus, kiel preni lud-karton de sur la planko), kaj tiamaniere, per siaj trompoj kaj nescio koruptas la mirindan veron de ĉi scienco. Mi scias pri certa damo, ke, iam, ŝi demandis al unu el ĉi falsaj horoskopistoj, ĉu hundineto ŝia gravediĝus, kiom da idoj ĝi naskus, kaj kiun koloron ili havus. La sinjoro astrologo respondis, farinte la koncernan horoskopon, ke la hundino gravediĝus kaj naskus tri idojn; unu estus verda, alia ruĝa kaj alia bunta, kondiĉe ke la hundino kopulaciu inter la dekunua kaj la dekdua horo de la tago aŭ de la nokto, en lundo aŭ en sabato. Sed okazis, ke du tagojn post la konsulto, la hundino mortis de troa manĝado, kaj la sinjoro astrologo tamen famiĝis en sia urbo kiel plej kompetenta horoskopisto, kian reputacion havas la pliparto el ili.

—Malgraŭ ĉio —diris Sancho—, mi dezirus, ke via moŝto demandu al la simio, pere de majstro Pedro, ĉu veras viaj aventuroj en la kaverno de Montesinos. Ĉar mi opinias, kaj mi petas vian pardonon, ke ĉio estis fikcio kaj mensogo, aŭ almenaŭ, ke vi ĝin sonĝis.

—Ĉio eblas —respondis don Quijote—. Sed mi sekvos vian konsilon, eĉ se mi sentos skrupulojn.

Ĉi-momente majstro Pedro proksimiĝis voki la hidalgon, dirante, ke jam la teatro staris preta, kaj petante, ke li iru ĉeesti la ludon pro ties granda intereso. Don Quijote informis pri sia ideo al la marionetisto kaj petis lin, ke, unue, li

demandu al sia simio, ĉu certaj aferoj okazintaj en la kaverno de Montesinos estis veraj aŭ nur sonĝitaj, ĉar ŝajnis al li, ke ili havas parton de vero kaj parton de sonĝo. Majstro Pedro, sen respondi eĉ unu vorton, iris preni la simion, metis ĝin antaŭ don Quijote kaj Sancho kaj diris:

—Sinjoro simio, ĉi kavaliro deziras scii, ĉu kelkaj aferoj de li travivitaj en la kaverno de Montesinos estas veraj aŭ falsaj.

Li faris la kutiman geston, la simio saltis sur lian livan ŝultron kaj kvazaŭ-parolis al li en la orelon. Tuj poste majstro Pedro deklaris:

—La simio diras, ke unu parto el ĉio vidita kaj farita de via moŝto veras, kaj ke la alia parto falsas. Ĝi aldonis, ke ĝi scias nenion plian pri ĉi afero, sed ke ĝi respondos ajnan novan demandon en la venonta vendredo; nune, ĝia kapablo diveni elĉerpiĝis kaj ne revenos ĝis la vendredo, kiel dirite.

—Ĉu mi ne diris, ke mi ne povas kredi vera eĉ la duonon de tio, kion vi rakontis pri la kaverno? —diris Sancho.

—Siatempo oni scios, Sancho —respondis don Quijote—. La tempo, rivelanto de ĉiaj aferoj, tiras ilin senescepte en la plenan lumon, eĉ se ili kaŝiĝas en la sino de la tero. Sed ni lasu nun ĉi temon, kaj ni iru vidi la teatron de majstro Pedro, ĉar mi pensas, ke ĝi rezervas al ni ian surprizon.

—Kiel «ian»? —diris majstro Pedro—. Ĉi teatro mia entenas sesdek mil surprizojn. Sciu, sinjoro don Quijote, ke ĝi rangas inter la plej vidindaj aferoj de ĉi mondo. Sed *operibus credite, et non verbis*,^[298] do mi metu manon en la laboron, ĉar la tempo pasas kaj ni havas multon por fari, diri kaj elmontri.

Don Quijote kaj Sancho sekvis lin ĝis la loko, kie la teatro jam staris muntita kaj nekovrita, abunde garnita per vaksaj

kandeletoj, kies lumo donis al ĝi brile okulfrapan aspekton. Majstro Pedro, kiel manipulanto de la pupoj, eniris en la budo-forman teatro, kaj, ekstere, lokis sin unu knabo, servisto de majstro Pedro, por ekspliki kaj komenti la argumenton. Li tenis vergeto en la mano por montri per ĝi al la diversaj marionetoj aperontaj.

Don Quijote, Sancho, la kuzo kaj la paĝio okupis la plej bonajn lokojn, ankaŭ la ceteraj gastejanoj sidiĝis, aŭ staris, antaŭ la teatro, kaj la juna komentisto komencis diri kion aŭskultos aŭ legos la aŭskultanto aŭ leganto de la sekvanta ĉapitro.

[296] Kiel en aliaj okazoj, Sancho miskomprenas, kaj konfuzas «pakton» kun «pako» kaj «implicita» kun «implikita».

[297] Cervantes ripetas ĉi tie penson el la Biblio (Agoj de la Apostoloj 1,7).

[298] Latinaĵo: «kredu la farojn, se ne la vortojn». El la Biblio (Johano 10,38).

Ĉapitro 26

Daŭrigo de la amuza aventuro de la marionetisto,
kun aliaj aferoj vere legindaj

Ĉiuj silentis, same la helenoj kiel la trojanoj;^[299] mi volas diri, ke la spektantoj de la ludo tenis sian atenton alkroĉita al la lipoj de la komentisto. Tiam, malantaŭ la kurteno aŭdiĝis la sono de kelke da tamburoj kaj trumpetoj kaj la subita salvo de multaj kanonoj. La bruo baldaŭ ĉesis, la knabo levis la voĉon kaj diris:

—Ĉi vera historio, ludota ĉi tie al viaj moŝtoj, estas prenita, vorton post vorto, el la francaj kronikoj kaj el la hispanaj romanoj, ĉie cirkulantaj de buŝo al buŝo, eĉ inter la buboj de la stratoj. Ĝi montras, kiel la sinjoro don Gaiferos liberigas sian edzinon Melisendra, kaptitino en Hispanujo, el la manoj de la maŭroj de la urbo Sansueña, nun konata sub la nomo de Zaragoza, Vidu, sinjoroj, ke don Gaiferos ludas triktrakon, laŭ la versoj de la kanzono:

Per la triktrako ludas don Gaiferos,
pri Melisendra tute forgesinte.

»Kaj ĉi eminentulo aperanta tie kun krono sur la kapo kaj sceptro en la mano estas la imperiestro Karolo la Granda, ŝajna patro de la menciita Melisendra. Ĉagrenita pro la pigro kaj neglektemo de sia bofilo, jen li iras admoni lin; rimarku, ke li krude kaj serioze lin skoldas, ĝis tia ekstremo, ke ŝajnas, kvazaŭ li volus doni per la sceptro kelke da batoj sur la kapon de la bofilo; kaj pluraj aŭtoroj asertas, ke li ja faris tion senhezite kaj forte. Dirinte, per multe da rezonoj, ke don

Gaiferos endanĝerigus sian honoron, se li ne klopodus liberigi sian edzinon, la imperiestro daŭrigas, laŭ la historio:

Jam vi aŭdis: nun, decidu.^[300]

»Rigardu, sinjoroj, kiel la imperiestro turnas la dorson al don Gaiferos kaj lasas lin ĉagrenita; atentu nun, kiel kolere kaj senpacience don Gaiferos forĵetas de si la tabulon de la triktrako kaj la ludopecojn, petas urĝe la armaĵon kaj suplikas al sia kuzo don Rolando, ke li pruntu al li sian glavon Durindana; rimarku, ke don Rolando rifuzas fari la prunton kaj, anstataŭe, proponas sin kiel kunulon lian en la riska entrepreno baldaŭ komencota de don Gaiferos. Sed la kuraĝa kaj furioza kavaliro ne akceptas la proponon kaj diras, ke li sola, sen ies helpo, tre kapablas liberigi sian edzinon, eĉ se oni retenus ŝin en la pleja profundo de la tero. Ĉe tio li eliras por surmeti la armaĵon kaj tuj komenci la vojaĝon. Nun, sinjoroj, turnu la rigardon al la turo tie videbla, kaj faru al vi la ideon, ke ĝi estas unu el la turoj de la alkazaro de Zaragoza nun nomata La Alfajería. La damo vestita per maŭra kostumo kaj aperanta en ĉi balkono estas la senegala Melisendra, kiu ofte rigardas de tie la vojon al Francujo, kaj konsolas sin je sia enfermiteco, pensante pri Parizo kaj sia edzo. Observu nun ĉi novan incidenton, kian eble oni neniam antaŭe vidis. Ĉu vi ne rimarkas ĉi maŭron? Li iras sur la pintoj de la piedoj, silente, kun fingro sur la lipoj, kaj proksimiĝas deposte al Melisendra. Observu nun, kiel li kisas ŝin plene sur la buŝon, kaj kiel rapide ŝi kraĉas kaj poste viŝas al si la lipojn per la blanka maniko de sia ĉemizo, kaj kiel ŝi lamentas kaj deŝiras siajn belajn harojn, kvazaŭ ili kulpus je lia friponaĵo. Observu ankaŭ, ke alia maŭro de serioza mieno, la reĝo Marsilio de Sansueña, promenas en la koridoro, vidas la insolenton de la unua maŭro kaj ordonas, kvankam la kisinto estas parencio kaj granda favorito lia, ke oni lin kaptu kaj donu al li ducent frapojn per skurĝo. Jen kiel oni kondukas lin tra la ĉefaj

stratoj de la urbo, kun anoncistoj ĉe-fronte kaj gardistoj malantaŭe, kaj kiel oni aplikas la punon preskaŭ tuj post la delikto, ĉar inter la maŭroj ekzistas nek procesoj nek apelacioj, diference ol ĉe ni.

—Knabo —laŭtis tiam don Quijote—. Knabo, daŭrigu vian historion tute rekte, sen fari deviojn, ĉar, por aserti ion vera, necesas multe de pruvoj kaj repruvoj.

—Knabo, faru kion ĉi sinjoro ordonas al vi —diris deinterne majstro Pedro— kaj ne perdu vin en digresioj. Estos pli bone tiel. Tenu vin do al via simpla melodio kaj ne implikiĝu en kontrapunktoj, ĉar ili kutimas missoni pro sia komplikeco.

—Tre bone —respondis la knabo.

Kaj li daŭrigis jene la historion:

—Ĉi tie, ĉi surĉevala figuro en gaskon-stila mantelo estas don Gaiferos mem; kaj jen, lia edzino, jam venĝita pri la insolento de la lasciva maŭro, staras kun pli bona kaj serena mieno ĉe la kreneloj de la turo kaj alparolas sian edzon, kiun ŝi prenas por simpla vojaĝanto; kiun ili diris unu al la alia, tio troviĝas en la romano:

Se vi al Francujo iras,
pri Gaiferos demandadu.

»Sed mi ne ripetos nun ilian konversacion, ĉar kutime troa vortofluo kaŭzas enuon. Sufiĉas vidi, kiel don Gaiferos konigas sin, kaj kiel Melisendra, laŭ siaj ĝojaj gestoj, montras, ke ŝi rekonis lin, des pli nun, kiam ŝi ĵetas sin de la balkono kun la intenco fali sur la gropon de la ĉevalo de ŝia brava edzo. Sed, ve al ŝi! Rigardu, kiel la rando de ŝia jupo kroĉiĝas al feraĵo de la balkono, kaj kiel ŝi pendas en la aero kaj ne povas atingi la teron. Tamen, rimarku, ke la kompatema ĉielo helpas kiam plej necese, ĉar don Gaiferos

proksimiĝas, kaj senrigarde, ĉu li deŝiros aŭ ne ŝian belan jupon, prenas ŝin kaj per la forto de la brakoj igas ŝin descendi ĝis la tero. Poste li ŝin impulsas sur la gropon de sia ĉevalo, kie ŝi ekrajdas vir-stile, t.e. kun la kruroj forkmaniere dismetitaj. Don Gaiferos rekomendas al ŝi, ke ŝi forte ĉirkaŭprenu lin deposte kaj kroĉu siajn manojn sur lia brusto, por ke ŝi ne falu, ĉar sinjorino Melisendra ne havas la kutimon rajdi tiamaniere. Ankaŭ aŭskultu, kiel la ĉevalo kontente henas, tial, ke ĝi portas tiel grandan ŝarĝon da kuraĝo kaj belo en la personoj de sia mastro kaj sia mastrino. Vidu, kiel ili faras turnon kaj elrajdas el la urbo kaj, gajaj kaj feliĉaj, prenas la vojon al Parizo. Iru pace, ho senegala paro da veraj amantoj! Sekure atingu la landon de viaj deziroj, sen ke la fortuno obstaklu vian feliĉan vojaĝon! La okuloj de viaj parencoj kaj amikoj vidu vin ĝui la ceteron de via vivo, kaj ĝi estu longa, kiel la vivo de Nestoro!^[301] Majstro Pedro levis tiam denove la voĉon:

—Parolu simple, knabo, ne bombastu: ĉia afektado mavas.

La komentisto respondis nenion al la averto kaj daŭrigis:

—Ĉie troviĝas personoj scivolaj, ĉion observantaj. Ili vidis la descendon kaj surĉevaligon de Melisendra, informis al la reĝo Marsilio kaj ĉi lasta ordonis doni la alarmon. Kaj rimarku, kiel rapide oni plenumis lian ordonon, ĉar la urbo tondras kaŭze de la sonoriloj sonantaj en la turoj de la moskeoj.

—Tio ne veras —interrompis don Quijote—. Majstro Pedro eraras rilate al ĉi afero de la sonoriloj, ĉar inter la maŭroj oni uzas, ne sonorilojn, sed tamburojn kaj specon de ŝalmo simila al niaj klarnetoj. Kaj aŭdigi sonorilojn en Sansueña certe estas granda absurdo.

Ĉe tio majstro Pedro ĉesigis la sonoradon kaj diris:

—Ne zorgu pri bagateloj, sinjoro, nek pretendu, ke ĉio estu perfekta, ĉar perfekteco ne ekzistas. Ĉu oni ne ludas ĉie, preskaŭ ĉiutage, milon da komedioj plenaj de mil nekongruaĵoj kaj absurdoj, kaj tamen ili furoras, kaj oni auŝkultas ilin, ne nur kun plezuro, sed eĉ kun admiro? Daŭrigu, knabo, kaj ne zorgu. Tiel longe kiel mi plenigos mian burson, ne gravas, ĉu mi prezentas tiom da absurdoj, kiom da atomoj ekzistas en la suno.

—Vi pravas —respondis don Quijote.

Kaj la knabo daŭrigis:

—Rigardu, kiel multenombra kaj pompa rajdantaro elgalopas el la urbo kaj persekutas la du katolikajn geamantojn. Kiom da trumpetoj sonas, kiom da ŝalmoj fajfas, kiom da tamburoj tondras! Mi timas, ke oni fine kaptos kaj returne kondukos la paron alligita al la vosto de ilia ĉevalo, kio estus terura spektaklo.

Vidante tiom da maŭroj kaj auŝkultante tiom da bruoj, don Quijote pensis, ke li devas helpi la fuĝantojn, do li stariĝis kaj laŭtis:

—Neniam mi toleros, ke antaŭ mi oni faru tian perforton kontraŭ la fama, kuraĝa kaj amanta kavaliro don Gaiferos. Haltu, finaskita kanajlaro, ne sekvu nek persekutu lin: alie, preparu vin batali kontraŭ mi.

Tion dirante, li elingis la glavon, ĵetis sin per unu salto a la teatro kaj, neimageble furioza kaj rapida, ellasis hajlon da hako kontraŭ la maŭroj-marionetoj, renversante unujn, senkapigante aliajn, mutilante kelkajn kaj detruante multajn; kaj inter siaj batoj, li donis tian hakon desupre, ke se majstro Pedro ne kaŭriĝus, kuntiriĝus kaj buliĝus, la hidalgo fortranĉus lian kapon pli facile ol se ĝi konsistus el marcipano.

Majstro Pedro laŭtis, dirante:

—Haltu, sinjoro don Quijote! Rimarku, ke vi renversas, dispecigas kaj murdas, ne verajn maŭrojn, sed figuretojn el kartono! Ve al mi! Vidu, ke vi detruas kaj ruinigas ĉion, kion mi posedas!

Tamen don Quijote, svingante la glavon jen per unu mano, jen per la du, ne ĉesis ellasi, kvazaŭ hajlon, hakojn desupre, dedekstre kaj delive. Fine en malpli da tempo necesa por diri du *credos*, li disfalis la tutan teatron sur la plankon kaj splitis en pecojn ties figurojn kaj kulisojn: la reĝo Marsilio vidiĝis grave vundita, kaj la imperiestro Karolo la Granda havis sian kapon kaj kronon distranĉitaj en du partojn. La senato de spektantoj panikiĝis, la simio fuĝis al la tegmentoj de la domo, la kuzo timis, la paĝio teruriĝis, kaj eĉ Sancho Panza ege alarmiĝis, ĉar poste, kiam la tempesto pasis, li ĵuris, ke neniam antaŭe li vidis sian mastron posedata de tiel senbrida furiozo.

Antaŭ la ĝenerala detruo de la teatro, don Quijote iom trankviliĝis kaj diris:

—Mi ŝatus vidi ĉi-loke kaj ĉi-momente la mienon de la homoj, kiuj ne kredas, nek volas kredi, ke la vagantaj kavaliroj utilas en la mondo, Nu, kio okazintus al la brava don Gaiferos kaj al la bela Melisendra, se mi ne troviĝus ĉi tie? Sendube ili estus jam sub la povo de ĉi hundoj, suferante hontindajn humiligojn. Tiel do, longe vivu la vaganta kavalirismo super ĉio ajn ekzistanta en la mondo!

—Vivu longe kaj feliĉe! —interrompis lin majstro Pedro kun lamenta voĉo—. Kaj mi mortu, ĉar, pro mia aĉa sorto, mi povas diri, kiel la reĝo don Rodrigo:

Mi reĝadis Hispanujon,
sed hodiaŭ ne posedas

unu solan tur-krenelon.

»Antaŭ, ne duonhoro, sed apenaŭ du minutoj, mi mastris super reĝoj kaj imperiestroj, kaj mia staloj, kofroj kaj sakoj plenis de nekalkulebla nombro da ĉevaloj kaj belaj kostumoj, kaj nun mi vidas min afliktita kaj nekonsoleble paŭpera kaj mizera kaj, plej bedaŭrinde, sen la simio, ĉar eĉ tra la dentoj mi ŝvitos en mia penado rekapti ĝin. Kaj ĉion ĉi mi ŝuldas al la absurda atako de kolero de ĉi sinjoro kavaliro, laŭdire protektanto de orfoj, riparanto de arbitroj kaj faranto de aliaj bonaĵoj. Nur ĉi-okaze mankis lia grand-animeco. Benatu milfoje Dio en la trono de sia gloro! Kaj prave ĉi viro nomiĝas Kavaliro de la Trista Mieno, se konsideri, ke li detruis la mienon de miaj figuroj!

Sancho Panza, kortuŝita de la lamentado de majstro Pedro, diris al li:

—Ne ploru, majstro Pedro, ne tiel veadu, aŭ vi ŝiros al mi la koron. Sciu, ke mia sinjoro don Quijote estas tiel skrupula kristano kaj katoliko, ke, se li komprenos, ke li misagis kontraŭ vi, li tion rekonos kaj volos larĝe kompensi vin.

—Mi kontentiĝus, se don Quijote pagus al mi parton de la damaĝo suferita de miaj pupoj. Tiel li kvietigus sian konsciencon, ĉar oni ne eskapas el la eterna damno, se oni retenas la proprajon de alia persono kontraŭ ties volo, kaj oni rifuzas ĝin redoni.

—Vi pravas —diris don Quijote—. Sed, laŭ mia scio, mi havas nenion vian, majstro Pedro.

—Ĉu vere nenion? —respondis la marionetisto—. Rigardu al la fragmentoj dise kuŝantaj sur ĉi dura kaj sterila tero. Ĉu ilin ne disĵetis kaj detruis la nevenkebla forto de via potenca brako? Kies estis iliaj korpoj? Ĉu ili ne apartenis al mi? Kaj per kio mi vivtenis min, se ne per ili?

—Mi plene konvinkiĝis nun —diris don Quijote—, ke veras tio, kion mi ofte suspektis, nome, ke la sorĉistoj, kiuj persekutas min, ĉiam metas antaŭ miaj okuloj figurojn en ties realaj formoj kaj poste transformas kaj ŝanĝas ilin en kion ajn ili deziras. Mi firme kaj senhezite asertas al vi, sinjoroj, ke ĉio okazinta ĉi tie ŝajnis al mi absolute aŭtenta, kaj ke Melisendra estis Melisendra; don Gaiferos, don Gaiferos; Marsilio, Marsilio; kaj Karolo la Granda, Karolo la Granda. Sekve mi koleriĝis kaj, por plenumi mian devon de vaganta kavaliro, klopodis helpi kaj favori la fuĝantan paron; do mi faris bon-intence kion vi vidis, kaj se ĝi turniĝis en misagon, kulpas, ne mi, sed la perversaj uloj, kiuj min persekutas. Tamen, kvankam mia faro ne havis sian originon en la malico, mi volas kondamni min pagi la damaĝon; tiel do, majstro Pedro, kalkulu kiom valoras la detruitaj figuroj, kaj mi tuj pagos al vi per bona kaj kontanta mono hispana.

Majstro Pedro riverence sin klinis kaj diris:

—Ne malpli mi esperis de la senegala spirito kristana de la kuraĝa don Quijote de La Mancha, vera helpanto kaj protektanto de ĉiuj mizeraj kaj afliktitaj vagabondoj. La sinjoro gastejestro kaj la granda Sancho funkciis inter via moŝto kaj mi kiel arbitraciantoj kaj taksantoj koncerne la valoron de la figuroj ne plu uzeblaj.

La gastejestro kaj Sancho akceptis la rolon proponitan de majstro Pedro. Poste la marionetisto levis de la planko la senkapan figuron de la reĝo Marsilio de Zaragoza kaj diris:

—Klare videblas, ke ĉi reĝo ne povas esti riparita en sian antaŭan formon. Tiel, do, mi kredas, se oni ne opinias alie, ke mi devas ricevi kvar realojn kaj duonon pro ĝia morto kaj detruo.

—Taksu la sekvantan —petis don Quijote.

—Nu, kaŭze de ĉi hako desupre malsupren —daŭrigis majstro Pedro, prenante la fenditan imperiestron Karolo la Granda— peti kvin realojn kaj kvaronon, ne estus peti multe.

—Ĝi ŝajnas ne eta kvanto —intervenis Sancho.

—Ankaŭ ne granda —replikis la gastejestro—. Ni povus rondigi la sumon je kvin realoj.

—Li ricevu tute kvin kaj kvaronon —decidis don Quijote—. Kvarono plia aŭ malplia neniel gravas en la totala sumo de ĉi bedaŭrinda misfortuno. Kaj vi, majstro Pedro, rapide finu vian taksadon, ĉar proksimas la horo vespermanĝi, kaj mi jam komencas senti apetiton.

—Por ĉi figuro de la bela Melisendra perdinta la nazon kaj unu okulon, mi volas ĝian ĝustan prezon: du realojn kaj dek du maravedojn.

—Nu, oni devus pensi, ke la diablo intervenis, se Melisendra kaj ŝia edzo ne troviĝas jam, almenaŭ, ĉe la franca landlimo —diris don Quijote—. Ĉar ŝajnis al mi, ke ilia ĉevalo ne galopis, sed flugis. Do, ne provu vendi katon deklarante ĝin leporo,^[302] t.e. ne montru al mi unu Melisendra sen nazo, dum la alia, se ĉio iras bone, senzorge plezurigas sin kun sia edzo en Francujo. Tiel do, majstro Pedro, lasu, ke Dio disdonu al ĉiu ties parton, kaj ni konduku rekte kaj bon-intence. Nu, daŭrigu.

Majstro Pedro, vidante, ke la menso de don Quijote komencis denove lami kaj repreni sian oldan temon, ne volis, ke li plene senbridiĝu, kaj diris:

—Certe ĉi figuro estas, ne Melisendra, sed unu el ŝiaj ĉambristinoj; sekve, donu al mi sesdek maravedojn por ĝi, kaj mi kontentos kaj konsideros min bone pagita.

Ĉi-maniere majstro Pedro taksis la prezon de multaj aliaj kriplaj figuroj, poste la arbitraciantoj faris al ĝi dekalkulon, kiun akceptis ambaŭ partioj. La totala sumo fiksiĝis je kvardek realoj kaj tri kvaronoj, kaj Sancho tuj transdonis ĝin. Sed majstro Pedro petis du pliajn realojn por la laboro rekapti la simion.

—Donu ankaŭ ilin, Sancho —diris don Quijote—, ne por ke li reprenu la simion, sed kiel trinkmonon. Du cent kromajn mi donus ĉi-momente, kiel rekompencan, al la persono kiu povus certigi al mi, ke la sinjorino doña Melisendra kaj la sinjoro don Gaiferos troviĝas jam en Francujo kaj inter siaj parencoj.

—Mia simio tion klarigus pli bone ol ajna persono — respondis majstro Pedro—. Sed eĉ ne la diablo kapablas kapti ĝin nun. Malgraŭ ĉio, mi imagas, ke ĝia kor-inklino al mi kaj la malsato puŝos ĝin serĉi min ĉi-nokte. Ni vidos. Morgaŭ frue venos plue.

Tiel do, finiĝis la tempesto kaŭzita de la pupoteatro, kaj oni vespermanĝis pace kaj konkorde je la kosto de don Quijote, kiu estis ekstreme malavara. La viro de la lancoj kaj la halebardoj foriris antaŭ ol komenciĝis la aŭroro, kaj, jam post la tagiĝo, la kuzo kaj la paĝio diris adiaŭ al don Quijote: la unua por sin direkti al sia hejmo; la alia por daŭrigi sian vojaĝon, kaj la hidalgo donis al li dek du realojn, ke li helpu al si per ili survoje.

Majstro Pedro tre bone konis don Quijote kaj ne volis plu implikiĝi en novajn problemojn kun li; tiel do, li levis sin antaŭ ol la suno, prenis la restaĵon de la pupoteatro kaj, kune kun la simio, ankaŭ foriris serĉi siajn aventurojn. La gastejestro, kiu ne konis la hidalgon, miris tiom je lia frenezo kiom je lia malavaro. Fine Sancho, ordonita de sia mastro, tre bone pagis lin, kaj proksimume je la oka matene, ili adiaŭis

lin, elrajdis el la gastejo kaj ekiris sur la vojo, kie ni lasas ilin, ĉar nun estas oportuna momento por rakonti kelke da aferoj apartenantaj al ĉi fama historio.

[299] Parodie, Cervantes uzas ĉi unuan verson de la dua libro de *Eneado*, de Vergilio.

[300] Verso el fama romano pri Gaiferos kaj Melisendra, verkita eble de Miguel Sánchez, samtempulo de Cervantes.

[301] Unu el la helenaj reĝoj partoprenintaj en la milito de Trojo. Laŭ la legendo li vivis tricent jarojn.

[302] Proverba esprimo, uzata ankaŭ en figura senco: vendi senvaloraĵon kredigante, ke ĝi estas io pli multekosta.

Ĉapitro 27

Kie oni klarigas, kiuj estis majstro Pedro kaj lia simio, kaj kiel don Quijote fiaskis en la aventuro de la iaoj, ĉar ĝi ne finiĝis, kiel li pensis kaj volis

Cide Hamete, kronikisto de ĉi granda historio, komencas la jenan ĉapitron tiel: «Mi ĵuras kiel katoliko kristano», kaj al tio lia tradukanto aldonas, ke la ĵuro de Cide Hamete kiel kristano, kvankam li estis certe maŭro, signifas nur, ke, same kiel katoliko kristano pro sia ĵuro diras, aŭ devas diri, la veron, tiel same Cide Hamete ĵuras, kvazaŭ katoliko kristano, diri la veron pri don Quijote kaj speciale pri majstro Pedro kaj la magia simio, kiu lasta vekis admiron en la tuta regiono pro sia divena talento.

Tiel do, li diras, ke la legantoj de la unua parto de ĉi historio sendube bone memoras pri Ginés de Pasamonte, liberigita en Sierra Morena, kune kun aliaj galeruloj, de don Quijote: favoro, kiun poste mave dankis, kaj eĉ pli mave pagis tiel perversa kaj senprincipa bandaĉo. Ĉi Ginés de Pasamonte, nomata de don Quijote Ginesillo de Parapilla, ŝtelis poste de Sancho ties azenon. Kaj tial, ke en la unua parto forestis, kaŭze de la neglekto de la presistoj, sciigo pri kiel kaj kiam okazis la ŝtelo, multaj homoj atribuis la mankon al la ne firma memoro de la aŭtoro. Nu, verdire, kiam Sancho sidis dormante sur la azeno, Ginés ŝtelis ĝin per la sama ruzo uzita de Bruneo ĉe Albraca, por elŝovi el inter la kruroj de Scripante ties ĉevalon. Poste, kiel jam rakontite, Sancho retrovis sian azenon. Nu, ĉi Ginés timis la leĝon, kies membroj serĉadis lin por lin puni pro ties nekalkuleblaj friponaĵoj kaj krimoj, tiel multaj, ke, por rakonti ilin, li mem skribis dikan volumon; tiel do, por eviti, ke oni lin rekaptu, li

decidis eniri en la regnon de Aragón, kovri al si la livan okulon kaj vagadi kiel marionetisto, ĉar li tre lertis en la manipulado de pupoj kaj en la ĵonglado.

Poste, de kelkaj liberigitaj kristanoj alvenintaj de Berberio, li aĉetis la simion kaj instruis ĝin salti sur lian ŝultron ĉe difinita signalo kaj flustri, aŭ ŝajne flustri ĉe lia orelo. Tiel preparita, antaŭ ol eniri en ajnan vilaĝon kun siaj teatro kaj simio, li kolektis informojn en la plej proksima loko, kaj se eble inter la personoj plej konfidencemaj, pri la vilaĝaj eventoj kaj ties protagonistoj. Li ĉion enkapigis kaj, jam en la vilaĝo, unue prezentis en sia teatro diversajn ludojn pri unu historio aŭ alia, sed ĉiuokaza amuza kaj populara. Poste, kiam la ludo finiĝis, li anoncis la talenton de sia simio, dirante al la vilaĝanoj, ke ĝi devenas la paseon kaj nunon, sed apenaŭ ion pri la futuro. Por ĉiu respondo li petis du realojn, kvankam iam kaj tiam li faris rabaton, se tion konsilis lia sondado de la demandanto. Kelkfoje li prezentiĝis en la hejmo de homoj, kies aferojn li konis, kaj, eĉ se ili nenion demandis, por eviti al si la devon pagi, li faris la signalon al la simio kaj tuj poste rakontis, ke la besto ĵus diris jen tion, jen alion, sed ĉiuokaze liaj riveloj ĝuste respondis al la faktoj. Tiel li akiris egan reputacion, kaj oni konstante petis liajn servojn. Aliajn fojojn, dank' al lia sagaco, liaj respondoj akordiĝis al la demandoj, kaj tial, ke neniam oni urĝis aŭ instigis lin klarigi, kiel do divenas la simio, li senĝene trompis la vilaĝanojn kaj plenigis sian burson. Nu, enirante en la gastejon, li tuj rekonis la hidalgon kaj ties ŝildiston, do estis al li facile mirigi ilin kaj ankaŭ la ceterajn gastejanojn; sed kostus al li kare, se la mano de don Quijote estus descendita iom pli, kiam li fendis la kapon de la reĝo Marsilio kaj detruis ties tutan kavalerion, kiel dirite en la antaŭa ĉapitro. Kaj en tio konsistas la tuta historio de majstro Pedro kaj la simio.

Sed nun, ni revenu al don Quijote de La Mancha. Sciu, ke, elirinte el la gastejo, li decidis unue vagi sur la bordoj de la rivero Ebro kaj ties apudaj lokoj, kaj nur poste plu vojaĝi al Zaragoza, konsiderante, ke li disponas sufiĉan tempon ĝis la celebros de la turniroj. Li do sekvis kun ĉi intenco sian vojon kaj dum du tagoj nenion menciinda okazis al li. Tiam, en la tria tago, surprizante monteton, li aŭdis fortan bruon de tamburoj, trumpetoj kaj arkebuzoj, kaj ekpensis, ke regimento de soldatoj pasas proksime. Por vidi ĝin, li spronis Rocinante, atingis la supron de la monteto kaj distingis ĉe ĝia piedo —laŭ sia kalkulo— pli ol du cent virojn provizitajn per diversaj armiloj, nome, lancoj, arbalestoj, halebardoj, pik-stangoj kaj kelkaj arkebuzoj kaj rondaj ŝildoj. Li sobiris la deklivon, kaj tiel proksimiĝis al la eskadrono, ke li povis klare vidi la flagojn kaj rimarki ties kolorojn kaj emblemojn. Precipe unu standardo el blanka sateno tiris lian atenton, ĉar ĝi havis surpentrita la kvazaŭveran figuron de azeneto ŝajne el sarda raso, kun la kapo levita, la buŝo aperta kaj la lango montriĝanta, t.e. en la pozo de azeno blekanta; ĉirkaŭ ĉi figuro vidiĝis, skribitaj per grandaj literoj, ĉi du versoj:

Faris ne iaojn vanajn
la du vilaĝestroj karaj.

El ĉi devizo don Quijote konkludis, ke la eskadrono sendube apartenas al la vilaĝo de la iaoj. Tion li diris al Sancho, legis al li la skribaĵon de la standardo kaj aldonis, ke la viro rakontita al ili ĉi aferon eraris, ĉar li menciis, ke la iaantoj estis du magistratanoj kaj, laŭ la devizo, temis pri du vilaĝestroj.

—Tio signifas nenion, sinjoro —respondis Sancho—. Eble la magistratanoj de la iaoj leviĝis kun la tempo al la rango de vilaĝestroj, sekve oni povas apliki al ili same unu titolon kiel la alian, des pli, ke la veron de ĉi historio ne tuŝas, ĉu la iaantoj estis magistratanoj aŭ vilaĝestroj, se konsideri, ke ili

fakte kaj vere iais; cetere, vilaĝestro povas iai tiel bone kiel magistratano.

Baldaŭ ili sciiĝis, ke la mokata vilaĝo marŝas kontraŭ alia, kie ŝercoj ekscesis pli ol povus toleri la deco aŭ respekto ŝuldata al la najbaroj, don Quijote proksimiĝis al la eskadrono, ĉe la granda ĉagreno de Sancho, kiu neniam inklinis vidi sin miksita en tiaj aferoj. La viroj de la eskadrono ricevis lin en sian mezon, pensante, ke li apartenas al ilia partio. Tiam don Quijote, levante sian vizieron per gracia movo, alrajdis en noble brava teniĝo ĝis la standardo de la azeno, kaj tie la ĉefaj persono de la armeo lin ĉirkaŭis kaj rigardis, frapitaj de la sama miro, kiun li kutime inspiris, kiam oni lin vidis per la unua fojo. Rimarkante, ke ili algapas lin kaj parolas aŭ demandas nenion, don Quijote volis profiti tian silenton, kaj rompis la sian por diri laŭte:

—Karaj sinjoroj, mi suplikas vin plej insiste, ke vi ne interrompu kion mi volas diri al vi, ĝis vi juĝos, ĉu miaj vortoj vin ĝenas kaj ĉagrenas. En ĉi lasta okazo, ĉe via plej eta signo de protesto mi sigelos mian buŝon kaj bridos mian langon.

Ili respondis, ke li parolu laŭplaĉe, kaj ke ili volonte aŭskultos. Tiam, kun ĉi permeso, don Quijote daŭrigis:

—Mi estas, sinjoroj, vaganta kavaliro, okupiĝas per la armoj kaj laŭprofesie favoras al la misfortunaj kaj helpas al la senhavaj. Antaŭ kelkaj tagoj mi eksciis pri via bedaŭrinda situacio kaj pri viaj motivoj ofte preni la armeojn por venĝi vin kontraŭ viaj malamikoj; kaj profunde meditante pri viaj aferoj, ne unu fojon, sed multajn, mi trovis, ke, laŭ la reguloj de la duelo, vi eraras, se vi konsideras vin insultataj, ĉar unu sola individuo ne povas ofendi tutan vilaĝon, escepte se li akuzas ĝin pri perfido, kiam li ne konas la personon kulpan pri la dirita perfido, Ĉi-rilate ni havas la ekzemplon de don

Diego Ordóñez de Lara, kiu akuzis kaj defiis la tutan urbon de Zamora, ĉar li ne sciis, ke nur Vellido Dolfos plenumis la perfidon murdi la reĝon. Tial li akuzis kaj defiis la zamoranojn senescepte, kaj ĉiu el ili rajtis respondi la akuzon kaj akcepti la defion; tamen, estas vere, ke don Diego iom tro eksterlimiĝis kaj eĉ preteratentis la regularon pri la defioj, ĉar li nenial bezonis defii al la mortintoj, al la akvo, al la pano, al la beboj ne naskitaj ankoraŭ kaj al aliaj bagateloj menciitaj en lia proklamo. Sed evidentas, ke, kiam ies koloro superbordiĝas, nek patro, nek kuratoro, nek alia ajn persono kapablas ĝin deteni. Se, efektive, unu sola homo ne povas defendi regnon, provincon, urbon aŭ tutan vilaĝon, tiam ne necesas klopodi venĝi sin kontraŭ tia ofendo, ĉar ĝi vere ne ekzistas. Bele estus, se la homoj de la vilaĝo alnomata «La Reloja»^[303] batalus ĝismorte kontraŭ la prononcantojn de la alnomo, aŭ se tiel kondukus cazalanoj, melongenuloj, balenidoj, sapistoj kaj aliaj,^[304] kies moknomoj ordinare trovas favoron nur inter la buboj de la stratoj kaj inter senprincipaj uloj! Bele estus, se ĉi famaj urboj kolerus kaj venĝus sin senĉese kaj elingus la glavon eĉ en la plej etaj kvereloj! Ne, ne, la ĉielo ne deziru nek permesu tion. La viroj saĝaj kaj prudentaj, kaj la regnoj bone regataj, devas preni la armojn, elingi la glavojn kaj riski siajn personojn, vivojn kaj havon nur por kvar motivoj: unue por defendi la katolikan fidon; due por defendi sian vivon, kion permesas la dia kaj la natura leĝoj; trie, por defendi sian honoron, sian familion kaj sian posedaĵon; kvare por servi la reĝon en justa milito. Kaj oni povus aldoni kvinan motivon (fakte asimileblan en la duan), nome, por defendi la patrimon. Aparte de ĉi ĉefaj kvin motivoj, eble ekzistaj aliaj kaŭzoj justaj kaj pravaj, por kies defendo oni devus preni la armojn. Sed uzi ilin pro bagateloj aŭ pro aferoj pli ridindaj kaj amuzaj ol ofendaj, ŝajnas decido rivelanta absolutan mankon de prudento. Krome, venĝi sin nejuste (kaj efektive neniam venĝo povas esti justa) rekte atencas kontraŭ la sankta

religio, kies doktrinon ni obeas, kaj kiu ordonas fari bonon al niaj malamikoj kaj reciproki per amo al la personoj nin abomenantaj; ĉi ordono, kvankam ŝajne iom malfacile plenumebla, prezentas tian karakteron nur al homoj pli inklinaj al la mondo kaj la karno ol al Dio kaj la spirito. Jesuo Kristo, Dio kaj homo vera, leĝodonanto nia, kiu neniam mensogis, nek povis aŭ povas mensogi, deklaris sian jugon milda kaj sian ŝarĝon leĝera, kaj sekve Li ne povas al ni fari ion neplenumeblan. Se tiel do, la leĝoj homaj kaj diaj devias vin, sinjoroj, teni vin en paco.

—La diablo min prenu —diris Sancho en si— se mia mastro ne estas teologo, aŭ tiel simila al tio kiel ovo al ovo.

Don Quijote ĉesis paroli por iom spiri, rimarkis, ke ĉies atento fiksiĝas ankoraŭ sur lin, kaj decidis, daŭrigi sian paroladon. Sed tion li ne faris, ĉar Sancho vidante sian mastron paŭzi, antaŭiĝis al li, kaj diris kun sia kutima sagaco:

—Mia mastro, la sinjoro don Quijote de La Mancha, iam nomata Kavaliro de la Trista Mieno, kaj nun Kavaliro de la Leonoj, estas tre klera hidalgo kaj scias la latinan kaj la hispanan, tiel bone kiel bakalaŭro. Kaj en ĉio, kion li diras aŭ konsilas, li parolas kiel bona soldato. Li havas sur la pinto de la fingro ĉian regulon kaj leĝon rilatan al la tiel nomataj dueloj, sekve, konvenas, ke vi faru kion li diras, kaj oni min punu, se vi trompiĝus obeante lin, des pli, ke, kiel dirite, estas idiotaĵo kolero, se aŭdiĝas ies iao. Mi memoras ke, en mia knab-aĝo, mi laŭplaĉe iais, sen ke neniuj oponus, kaj tiel nature kaj lerte mi blekis, ke min respondis senescepte la azenoj de la vilaĝo. Sed ne pro tio mi ĉesis esti la filo de miaj ege honorindaj gepatroj, kaj, kvankam ses aŭ sep rigid-nukaj riĉuloj de la vilaĝo enviis ĉi talenton mian, eĉ ne unu joton mi zorgis. Kaj por ke vi vidu, ke mi diras la veron, atentu kaj

aŭskultu, ĉar ĉi scienco similas la naĝ-arton: se lernita, ne forgesita.

Tiam, kun la mano ĉe la nazo, li komencis iai tiel forte, ke la ĉirkaŭaj valoj resonis. Sed unu vilaĝano, kiu staris apud li, imagis, ke Sancho mokas ilin, kaj, levinte sian dikan kaj longan stangon, ellasis tian frapon, ke ĝi, neeviteble, faligis Sanchon sur la teron.

Don Quijote, vidante sian ŝildiston tiel mistraktita, sin ĵetis kun la lanco en la mano kontraŭ la agresinto, sed tiom da homoj sin intermetis, ke estis al li neeble venĝi Sanchon. Kontraŭe, kiam li vidis, ke nubo da ŝtonoj falas sur lin, kaj ke mil arbalestoj, kaj almenaŭ la sama nombro de arkebuzoj, minace celas lin, li turnis per la brido la ĉevalon kaj, galopante kiel eble plej rapide, eskapis de inter la vilaĝanoj, dum li preĝis al Dio plej elkore, ke Li Liberigu lin de la danĝero, ĉar li ne ĉesis timi, ke iu kuglo povus penetri tra lia dorso kaj eliri tra la brusto; kaj ĉiumomente li retenis la spiron, por vidi ĉu ĝi elfluas tra ia vundo. Sed la eskadrono kontentiĝis, vidante lin fuĝi, kaj ne pafis al li. Rilate al Sancho, oni metis lin, ankoraŭ, ne tute konscian, sur ties azenon kaj lasis lin iri post sia mastro. Vere, en sia sensenteco, li ne kapablus tion fari, sed la azeno proprainiciate sekvis la paŝojn de Rocinante, kies foreston ĝi ne povis suferi eĉ por unu momento.

Kiam don Quijote distanciĝis longan spacon, li turnis la kapon kaj rimarkis, ke Sancho iras al li. Tiam, vidante, ke oni ne persekutas, la hidalgo atendis sian ŝildiston.

La eskadrono de vilaĝanoj restis tie ĝis la nokto, kaj tial, ke iliaj malamikoj ne montriĝis por batali, ili revenis al sia vilaĝo, ĝojaj kaj feliĉaj. Kaj se ili konus la oldan kutimon de la grekoj, certe ili starigus trofeon sur la loko.

[303] Hispane, laŭlitere: «La Horloĝino». Iam, al kelkaj vilaĝoj oni donis tian alnomon, ĉar oni diris pri iliaj loĝantoj, ke ili deziris akiri por la turo de la kirko, ne horloĝon, sed «horloĝinon», kun la ideo negoci per ŝiaj eventualaj «horloĝidoj».

[304] En la epoko de Cervantes, mok-nomoj, respektive, de la loĝantoj de Valladolid, Toledo, Madrid kaj Sevilla. «Cazalanoj» devenas de Cazalla, famulo aŭtodafeita en la ĉefa placo de Valladolid en 1559.

Ĉapitro 28

Pri kelkaj aferoj, kiujn, laŭ Benengeli, la leganto scios, se li legos ilin kun atento

Kiam kuraĝulo forkuras, evidentas, ke li tion faras pro nesupereblaj cirkonstancoj kontraŭaj, kaj pro tio, ke prudenta viro devas rezervi sin por pli bona okazo. Ĉi vero pruviĝis ankoraŭfoje en ĉi epizodo de don Quijote, ĉar, antaŭ la kolero de la vilaĝanoj kaj la malicaj intencoj de tiel furioza eskadrono, li pafis sin for, kaj, sen atenti sian ŝildiston en ties danĝera situacio, li distanciĝis tiom multe, kiom li pensis necesa por senti sin sekura. Sancho, transverse sur sia azeno, sekvis lin, kiel dirite, atingis la hidalgon, kaj, jam denove konscia, faligis sin de la azeno al la piedoj de Rocinante, angorplena kaj muelita.

Don Quijote deseliĝis por ekzameni liajn vundojn, sed, trovante lin sana de la kapo ĝis la piedoj, diris kolere:

—Bolan momenton vi elektis por iai, Sancho! Kaj, de kie vi prenis, ke estas bone mencii la ŝnuron en la hejmo de la pendumito? Kia kontrapunkto, se ne el batoj, povus akompani vian iao-muzikon? Kaj danku Dion, Sancho, ke oni karesis vin per stango, anstataŭ fari al vi la signon de la kruco per la pinto de glavo!

—Nun mi tre feblas por respondi —diris Sancho—. Ŝajnas, kvazaŭ miaj vortoj elpuŝiĝus tra la dorso. Ni ekrajdu kaj foriru de ĉi tie. Mi promesas ne plu iai, sed nenio detenos min diri, ke la vagantaj kavaliroj fuĝas kaj lasas siajn bonajn ŝildistojn, muelitajn kiel henao aŭ tritiko, en la manoj de la malamiko.

—Retiriĝo ne estas forkuro —respondis don Quijote—. Sciuj, Sancho, ke kuraĝo ne bazita sur prudento nomiĝas temerareco, kaj ke la sukcesoj de la temerara pli ŝuldiĝas al la ŝanco ol al lia kuraĝo. Mi konfesas do, ke mi retiriĝis, ne ke mi forkuris, kaj tiamaniere mi imitis al multaj kuraĝuloj, kiuj rezervis sin por pli bonaj okazoj. La historio plenas de similaj ekzemploj, sed mi ne mencios ilin nun, ĉar ilia rakontado tedus min kaj ne utilis al vi.

Ĉe tio, jam Sancho surzeniĝis denove, helpate de don Quijote; poste ankaŭ la hidalgo grimpis sur Rocinante, kaj ili rajdis senurĝe ale al poplaro videbla de unu mejlo for. De tempo al tempo, Sancho elpuŝis profundan suspiron aŭ doloran ĝemon, kaj kiam don Quijote demandis lin pri la kaŭzo de tiel amara aflikto, la ŝildisto respondis, ke de la fino de la spino ĝis la nuko li suferas ĝissvene.

—Tia doloro venas sendube de tio, ke la stango vin frapinta estas longa kaj rekta kaj atingis la tutan dorson, kie troviĝas la partoj nun doloraj al vi. Kaj se la stango pli vaste atingus, pli da doloro vi sentus.

—Je Dio! —diris Sancho—. Via moŝto solvis grandan misteron kaj bele ĝin klarigis! Grandioze! Ĉu la kaŭzo de mia sufero troviĝas tiel kaŝita, ke vi devis diri al mi, ke kion la stango atingis, tio min doloras? Se miaj piedoj doloras, eble mi cerbumus por diveni la kaŭzon de tia doloro; sed diveni, ke kie oni batis, tie doloras, ne havas grandan meriton. Vere, sinjoro kaj mastro mia, de fremda dento ni doloron ne sentas, kaj mi vidas kun la paso de la tempo, ke tre ete mi povas esperi de via moŝto, ĉar, se ĉi-foje vi lasis, ke oni batu min, en aliaj cent okazoj ripetiĝos la iamaj bernadoj kaj similaj regaloj; kaj se ĉi-foje pagis mia dorso, alifoje pagos miaj okuloj. Plej bone mi farus (sed, ĉar stulta, mi ne kapablas fari ion bonan en mia vivo), plej bone mi farus, mi diras, se mi revenus hejmen, al miaj edzino kaj filoj, por nutri

kaj subteni ilin per tio, kion Dio degnus doni al mi, anstataŭ treni min post via moŝto sur vojoj nenien kondukantaj kaj sur stratoj kaj padoj seneliraj, trinkante nesufiĉe kaj manĝante eĉ pli nesufiĉe. Kaj kion diri pri la dormo? Kalkulu, frato ŝildisto, sep futojn da grundo, kaj, se vi deziras pli, alkalkulu sep pliajn, prenu tiel multe kiel vi deziras, kaj sternu vin laŭplaĉe. Kiel ege mi ŝatus vidi la iniciatinton de la vaganta kavalirismo bruli en la infero kaj cindriĝi, aŭ almenaŭ, la unuan viron pretan servi ŝildiste al la idiotaj uloj, kiaj certe estis la vagantaj kavaliroj paseaj! Pri la nunaj mi diras nenion, kaj tial, ke via moŝto apartenas al ĉi epoko, mi ilin respektas. Krome mi konfesas, ke, se juĝi per viaj diroj kaj opinioj, vi scias iom pli ol la diablo.

—Mi vetus bonan sumon kontraŭ vi, Sancho, ke nun, kiam vi parolas libere kaj seninterrompe, nenio doloras vin en via tuta korpo. Eldiru, filo, kion ajn venas al via buŝo aŭ al via penso, ĉar, se tiel vi ne suferos, mi konsideros plezuro la ĉagrenon aŭskulti vian impertinentan paroladon. Kaj se tiom multe vi deziras reveni al via hejmo, al viaj edzino kaj filoj, Dio scias, ke mi ne oponos. Monon mian vi havas; kalkulu kiom da tempo pasis, de kiam ni eliris de nia vilaĝo ĉi trian fojon, kalkulu ankaŭ kiom, laŭ vi, vi devas ricevi por ĉi monato, kaj pagu vin mem.

—Kiam mi laboris por Tomé Carrasco, patro de la bakalaŭro Sansón Carrasco, bone konata de via moŝto —respondis Sancho—, mi lukris monate du dukatojn kaj la manĝon. Mi ne scias kiom mi devus ricevi de via moŝto, sed mi scias, ke la ŝildisto de vaganta kavaliro penadas pli ol laboristo de kampulo. La esenco de la afero estas, ke tia laboristo, kiom ajn li konsumas sian forton dum la tago, kaj kio ajn okazas al li, vespere gustumas varman manĝon kaj nokte dormas en lito, kion lastan mi ne faras de kiam mi servas vian moŝton. Se escepti nian kurtan restadon ĉe don Diego de Miranda, la piknikon, kiun mi ĝuis, elfosante el la marmitoj de Camacho,

kaj kion mi manĝis kaj trinkis ĉe Basilio, la ceteran tempon mi dormis sur la dura tero kaj sub la libera ĉielo, submetita al la rigoroj de la vetero, tenante min viva per pecoj de fromaĝo kaj krustoj de pano, kaj trinkante akvon de rojoj kaj fontoj troviĝantaj en la izolaj lokoj, kie ni ordinare vagas.

—Mi konfesu, Sancho, ke vi tute pravas —diris don Quijote—. Laŭ via kalkulo, kiom pli ol Tomé Carrasco donis, mi devas doni al vi?

—Mi opinias —respondis Sancho—, ke se via moŝto donus al mi du plusajn realojn monate, mi konsiderus min bone pagita. Tion, rilate al la salajro por mia laboro. Sed rilate al via parolo kaj promeso havigi al mi la gubernatorecon de insulo, estus juste, se vi aldonus, kiel kompenson, ses pliajn realojn, kio farus entute la sumon de tridek realoj.

—Tre bone —diris don Quijote—. Ni eliris el la vilaĝo antaŭ dudek tagoj. Sekve, laŭ la salajro, kiun vi asignis al vi, kalkulu kiom mi ŝuldas, kaj pagu vin mem, kiel dirite.

—Je Dio! —ekkriis Sancho—. Kiel bele nombras via moŝto! Rilate al la afero de la insulo, vi devus kalkuli, de la tago kiam via moŝto promesis ĝin al mi.

—Nu, antaŭ kiom da tempo mi faris la promeson, Sancho?

—Se mi bone memoras, antaŭ proksimume dudek jaroj, minus aŭ plus du tri tagojn.

Don Quijote donis al si per la manplato fortan frapon sur la frunton, komencis ridegi kaj diris:

—Apenaŭ du monatojn ni vagis en Sierra Morena aŭ en la tuta daŭro de niaj vojaĝoj, kaj vi diras, ke mi promesis la insulon antaŭ dudek jaroj! Mi pensas, ke vi volas, ke la monomia, kiun vi havas, restu definitive kun vi en formo de

salajro. Nu, se efektive tion vi deziras, mi donacas al vi la monon, kaj ĝi faru al vi bonon! Mi preferas esti paŭpera kaj senhava ol reteni tiel mavan ŝildiston. Diru, koruptanto de la ŝildista kodo de la vaganta kavalirismo, kie do vi vidis aŭ legis, ke ajna ŝildisto iam diskutis kun sia mastro pri kiom li devas ricevi monate pro siaj servoj? Plonĝu, fripono, monstro, diablo (ilin tri vi similas), plonĝu, mi diras, en la *mare magnum*^[305] de la kavaliraj historioj, kaj se vi trovas, ke ajna ŝildisto diris aŭ pensis kion vi ĉi tie parolis, pendumu min kaj tiru je miaj piedoj! Turnu per la brido, pli ĝuste, per la kondukiloj, vian azenon kaj reiru hejmen, ĉar vi ne faros eĉ unu plian paŝon kun mi. Ho, sendanka! Ho, mislokitaj promesoj! Ho vi, pli besta ol homa! Nun vi forlasas min, kiam mi decidis levi vin al tia stato, ke, spite al via edzino, oni titolus vin «sinjora moŝto»! Ĉu vi foriras nun, kiam mi havis la firman kaj rektan intencon fari vin sinjoro de la plej bona insulo de la mondo? Sed, kiel vi ofte diras, la mielo ne fariĝis por buŝo de azenoj. Vi estas azeno, kaj azeno vi estos ĝis la lasta tago de via vivo: ĉar mi firme kredas, ke vi atingos vian finon, antaŭ ol vi povus kompreni kaj scii, ke vi estas nura besto.

Dum don Quijote sputis ĉi riproĉadon, Sancho fikse lin rigardis kaj fine, plena de rimorso kaj aflikto, kaj kun larmoplenaj okuloj, diris per voĉo vea kaj febla:

—Jes, sinjoro, mi konfesas, ke, por ke mi estu kompleta azeno, nur la vosto mankas; se via moŝto deziras ĝin almeti al mi, mi rigardos ĝin bone meritita, kaj vin servos kiel azeno la ceteron de mia vivo. Via moŝto min pardonu, konsideru mian Junecon, pensu, ke mi scias malmulte kaj ke, se mi tro parolas, tion kaŭzas ne la malico, sed ia difekto de mia naturo. Sed «kiu eraras, kaj sian mison riparas, Di-obeas sin deklaras».

—Mi tre surpriziĝus, Sancho, se vi ne miksus ian proverbon en vian litanion. Nu, bone, mi pardonas vin, kondiĉe, ke vi korektos vin kaj ke, de nun, vi ne montriĝos tiel profit-ama, kaj, anstataŭe, klopodos plifortigi vian koron. Animu vin kaj atendu la efektivigon de miaj promesoj, ĉar, kvankam ili povas prokrastiĝi, ili estas plenumebblaj.

Sancho promesis ne perdi la esperon, eĉ se por tio li devus fortigi sin per sia propra feblo. Tiam ili enrajdis en la arbaron, kie don Quijote komforte aranĝis sin ĉe la piedo de ulmo, kaj Sancho ĉe la piedo de fago, ĉar tiaj arboj, kaj la ceteraj, havas piedojn, sed ne manojn. Sancho pasis la nokton ĝenate de doloro, tial, ke, pro la roso, li sentis pli intense la baton de la stango. De sia flanko, don Quijote noktis absorbita en siaj konstantaj meditadoj, sed fine la du viroj cedis al la premoj de la dormemo, kaj, ĉe la matenruĝo, daŭrigis sian vojon ale al la bordoj de la fama Ebro, kie okazis al ili /aventuro aperanta en la sekvanta ĉapitro.

[305] Latine: «granda maro».

Ĉapitro 29

Pri la fama aventuro de la ensorcĉita boato

Du tagojn post ol ili ekiris de la poplaro, don Quijote kaj Sancho, paŝon post paŝo kaj mejlon post mejlo, atingis la riveron Ebro. Vidi ĝin tre plezurigis la hidalgon, ĉar li rigardis kaj kontemplis la agrablon de la bordoj, la klaron de la akvo, la mildon de la fluo kaj la abundon de likvaj kristaloj. La ĉarma sceno revekis en lia memoro milon da amaj pensoj kaj precipe kion li vidis en la kaverno de Montesinos, ĉar, kvankam, laŭ aserto de la simio de majstro Pedro, lia vizio parte estis vera kaj parte falsa, li pli inklinis vidi ĝian veron, male ol Sancho, kiu pensis la tuton granda mensogo.

Nu, kiam ili tiel iris, aperis antaŭ ilia vido unu boato sen remiloj kaj rigilaro, alligita al trunko de ĉe-rivera arbo. Don Quijote ĉirkaŭrigardis kaj vidis eĉ ne unu solan homon; tiam, senplie, li descendis de Rocinante, kaj ordonis la ŝildiston deseliĝi kaj alligi la du bestojn al trunko de poplo, aŭ saliko tie staranta. Sancho demandis sian mastron pri la motivo de tiel subita rajdo-ĉeso kaj alligo.

—Sciu, Sancho —respondis don Quijote—, ke ĉi boato, rekte, certe kaj nedubeble, vokas kaj invitas min ensalti, por ke mi iru en ĝi helpi ajnan kavaliron, aŭ alian nobelan personon protektendan, kiu certe troviĝas en granda danĝero. Tiel okazas en la kavaliraj libroj, kaj tiel agas la sorĉistoj, kies faroj kaj paroloj legiĝas en la diritaj verkoj: kiam danĝero minacas ajnan kavaliron, kaj lin povas savi nur la mano de alia kavaliro, eĉ se inter unu kaj la alia ekzistas distanco de ses aŭ ok mil mejloj, aŭ pli, la sorĉistoj aŭ levas la duan kavaliron sur nubon, aŭ provizas lin per ŝipo, kaj, en apenaŭ la daŭro de unu palpebrumo, transportas lin, tra la aero aŭ

sur la maro, kien ili volas kaj kien lia helpo necesas. Tiel do, Sancho, ĉi boato sidas tie tiucele, tiel certe, kiel estas certe, ke nun lumas la suno; kaj antaŭ ol ĉi lasta subiros, alligu kune la azenon kaj Rocinante, kaj la mano de Dio nin gvidu, ĉar mi nepre enŝipiĝos, eĉ se monaĥoj pretendus konvinki min fari la malon.

—Nu, bone, se via moŝto ĉiupaŝe obstinas peli vin en ĉi aferojn, kiujn mi nomus absurdoj, mi devas nur obei kaj klini la kapon, ĉar, kiel diras la proverbo: «Faru kion via mastro ordonas, kaj vi sidiĝos kun li ĉe la tablo».^[306] Tamen, pro skrupuloj de konscienco, mi volas averti vin, ke ŝajnas al mi, ke ĉi boato apartenas, ne al sorĉistoj, sed al fiŝistoj de ĉi rivero, kie oni kaptas la plej bonajn alozojn de la mondo.

Ĉe tio, Sancho alligis la bestojn kaj, kun granda ĉagreno en sia koro, konfidis ilin al la gardo kaj protekto de la sorĉistoj. Sed don Quijote diris al li, ke li ne faru al si zorgojn pro la forlasiteco de la du animaloj, ĉar ilin priatentos tiu sama, kiu kondukos iliajn mastrojn tra *longincuos* vojoj kaj regionoj.

—Mi ne komprenas «longincuos», nek aŭdis tian vorton en mia tuta vivo —respondis Sancho.

—*Longincuos* —klarigis don Quijote— signifas foraj, kaj ne estas strange, ke vi ne komprenas ĝin, se konsideri, ke vi ne havas la devon scii la latinan, kiel certaj personoj, kiuj fanfaronas posedi ĝin, sed tute ne ĝin konas.

—Mi jam alligis la bestojn —diris Sancho—. Kion ni faru nun?

—Kion? —respondis don Quijote—. Krucosigni nin kaj levi la ankron, t.e. enŝipiĝi kaj tranĉi la ŝnuron, kiu tenas la boaton senmova.

Tuj poste, don Quijote ensaltis, Sancho faris same, la hidalgo tranĉis la ŝnuron, la boato apartiĝis iom post iom de la

bordo, kaj kiam Sancho troviĝis proksimume ses futojn de la rando, li komencis tremi, imagante sin baldaŭ pereonta. Sed plej doloris lin aŭdi la blekojn de la azeno kaj vidi la ĉevalon barakti por disligi sin. Tiam li diris al sia mastro:

—La azeno blekas plena de aflikto, ĉar ni ĝin forlasis, kaj Rocinante klopodas liberigi sin por nin sekvi. Ho karegaj amikoj, restu trankvilaj! La frenezo distanciganta nin de vi, turniĝu en disreviĝon kaj rekonduku nin al via flanko!

Tiam li komencis plori tiel amare, ke don Quijote, furioza kaj ĉagrenita, diris:

—Kion vi timas, poltrona? Kial vi ploras, lepor-kora? Kiu persekutas aŭ atakas vin, mus-anima? Ĉu mankas io al vi, ulo postulema eĉ meze de la plej granda regalo? Ĉu okaze vi iras per nudaj piedoj sur scitaj montoj? Ne, vi sidas sur benko, tiel komforte kiel arkiduko, kaj vin transportas la milda fluo de ĉi agrabla rivero, ĝis ni trafos baldaŭ en la vastan maron. Nu, certe ni jam atingis tien, kaj navigis ĝis nun almenaŭ du mil mejlojn, aŭ pli. Se mi havus astrolabon kun mi, mi mezurus la alton de la polusa stelo, kaj dirus al vi kiom ni veturis ĝis la nuna momento. Tamen, aŭ mi apenaŭ scias ion, aŭ ni jam pasis, aŭ baldaŭ pasos, trans la ekvinoksan linion, kiu dividas la teron je la sama distanco de ambaŭ polusoj.

—Kaj kiam ni alvenos al tia noca linio,^[307] kiom da distanco ni estos irintaj? —demandis Sancho.

—Tre granda —respondis don Quijote—, ĉar ni alvenos al la menciita linio, veturinte la duonon el la 360 gradoj, kiuj konsistigas la cirkonferencon de la globo kun ties akvo kaj tero, laŭ la komputo de Ptolemeo, la plej granda kosmografo iam ekzistanta.

—Je Dio, sinjoro —diris Sancho—. Belan ulon vi citis por apogi viajn asertojn! *Puto* kaj *gafo*, kaj krome, *meón!*^[308]

Don Quijote ridis je la interpreto de Sancho pri la nomoj «komputo», «kosmografo» kaj «Ptolemeo», kaj respondis:

—Sciu, Sancho, ke, laŭ la hispanoj kaj ceteraj personoj enŝipiĝantaj en Cádiz por veturi al la orientaj Indioj, ili scias, ke ili transpasas la ekvinokson, kiam en la ŝipo ĉies pedikoj mortas; eĉ ne unu restas viva, kaj vi ne trovus unu, eĉ se oni pagus ĝin al vi per oraj moneroj. Sekve do, Sancho, traŝovu unu manon sur via femuro, kaj se vi trafos ion vivan, la eksperimento dispelos niajn dubojn; se ne, ni transpasis la linion.

—Mi kredas eĉ ne unu vorton el viaj diroj —respondis Sancho—. Tamen, mi faros laŭ viaj ordonoj, kvankam mi ne scias, kiel utilis la eksperimento, se konsideri, ke mi vidas propraokule, ke ni apartiĝis de la bordo eĉ ne dek kvin futojn, kaj ke la fluo ne puŝis nin pli ol ses futojn antaŭen, ĉar Rocinante kaj la azeno staras en la sama loko, kie ni lasis ilin. Kaj, laŭ miaj observoj, la diablo nin prenu, se ni moviĝas pli rapide ol formiko.

—Faru la eksperimenton, kiel mi diris al vi, Sancho... kaj punkto. Vi scias nenion pri koluroj, linioj, paraleloj, zodiakoj, ekliptikoj, polusoj, solsticoj, ekvinoksoj, planedoj, signoj, punktoj kaj mezuroj de la sferoj ĉiela kaj tera. Se vi konus ĉion ĉi, aŭ almenaŭ parton, vi klare vidus, kiom da paraleloj ni transpasis, kiom da signoj kaj konstelacioj ni lasis malantaŭe, kaj kiom da ili ni preterpasas nun. Kaj mi ripetas: palpu vin kaj serĉu bone: kvankam mi kredas, ke vi estas nun tiel pura kiel blanka kaj glata paper-folio.

Sancho palpis sin, kaj, kiam lia mano glitis zorge kaj atente ĝis la posta parto de la liva genuo, li levis la kapon, rigardis

sian mastron kaj diris:

—Aŭ la eksperimento pruvas nenion, aŭ por alveni, kien via moŝto diras, mankas ankoraŭ multe de mejloj.

—Kial, Sancho? —demandis don Quijote—. Ĉu okaze vi trovis ion?

—Pli ol ion —respondis la ŝildisto.

Kaj, skuante la fingrojn, li lavis sian manon en la rivero, kie la boato lante glitis meze de la akvo, puŝite, ne de magia povo, aŭ de kaŝita sorĉisto, sed de la fluo, tiam milda kaj trankvila.

Ĉe tio vidiĝis du grandaj muelejoj meze de la rivero, kaj don Quijote, apenaŭ ilin rimarkis, laŭtis al Sancho:

—Ĉu vi vidas, frato? Tie staras la urbo, kastelo aŭ fortreso, kie sendube sidas la kavaliro subpremata, aŭ la reĝino, infantino aŭ princino en danĝero, por kies liberigo oni min prenis ĉi tien.

—Pri kiaj urboj, fortresoj aŭ kasteloj de la diablo parolas via moŝto? —diris Sancho—. Ĉu vi ne vidas, ke la domoj tie estas akvo-muelejoj, kie la tritiko faruniĝas?

—Silentu, Sancho —ordonis don Quijote—. Ili ŝajnas muelejoj, sed fakte, tio ili ne estas; mi jam diris al vi, ke la ensorĉoj transformas kaj modifas la naturan figuron de objektoj kaj personoj. Mi volas diri, ne ke la transformiĝoj vere kaj efektive okazas, sed ke ni vidas la ŝajnojn, kiel ni proprasperte scias, kaŭze de la metamorfozo de Dulcinea, unika azilo de mia espero.

Ĉe tio la boato, jam en la mezo de la rivero, komencis gliti ne tiel lante kiel antaŭe. Kaj, vidante la boaton flosi en la

direkto al la impeta kaj kirliĝanta fluo proksima al la akvo-radoj, kelkaj muelistoj alkuris kun longaj stangoj por haltigi la boaton. Kaj tial, ke ili aperis kun la vizaĝo kaj la vesto kovritaj de faruna pulvoro, ili aĉe aspektis.

—Viroj de la diablo! —ili kriegis—. Kien vi iras? Ĉu vi frenezas? Ĉu vi volas droni, kaj ke la radoj pistu vin?

—Jam mi diris, Sancho —avertis don Quijote—, ke ni alvenas al loko, kie mi devos montri la tutan forton de mia brako. Rimarku, kiom da insolentaj friponoj! Rimarku, kiom da demonoj nin alfrontas! Nu, kanajloj, vi vidis!

Kaj, stare sur la boato, li komencis laŭte minaci la muelistojn, dirante:

—Perversa kaj maligna bandaĉo, redonu la liberon al la persono, nobela aŭ ne nobela, kiun vi tenas senkonsidere enfermita en ĉi fortreso aŭ prizono. Mi estas don Quijote de La Mancha, alinome la Kavaliro de la Leonoj, kaj la alta ĉielo min elektis, ke mi entreprenu ĉi aventuron kaj metu al ĝi feliĉan finon.

Tiel parolante, li elingis la glavon kaj komencis ĝin svingi en la aero kontraŭ la muelistoj, kiuj, aŭdante, sed ne komprenante liajn frenezaĵojn, penis deteni per la stangoj la boaton, jam glitantan en la rapidan fluon de la akvo-radoj.

Sancho genuiĝis kaj pie petis la ĉielon savi lin de tiel evidenta danĝero, kion la ĉielo faris dank' al la rapida kaj lerta interveno de la muelistoj; blokante la boaton per la stangoj, ili ĝin detenis, sed ne sukcesis eviti ĝian renversiĝon kaj la sekvan falon de don Quijote kaj Sancho en la akvon; bonŝance, la kavaliro scipovis naĝi kiel anaso, kvankam la pezo de lia armaĵo puŝis lin dufoje ĝis la fundo de la rivero. Kaj sen la helpo de la muelistoj, kiuj sin ĵetis en la akvon kaj eltrenis la paron kun ties tuta pezo, ĉi loko estus

por Sancho kaj don Quijote alia nova Trojo. Poste, kiam oni surterigis ilin, pli trempitaj ol soifaj, Sancho genuiĝis, kunigis la manojn, fiksas la rigardon al la ĉielo kaj petis de Dio, per fervora kaj longa preĝo, ke en la futuro Li liberigu lin de la absurdaj projektoj kaj entreprenoj de lia mastro.

Ĉe tio alvenis la fiŝistoj, mastroj de la boato, kaj vidante ĝin dispecigita de la akvo-radoj, sin ĵetis kontraŭ Sanchon, por forpreni de li ties veston, kaj postulis de don Quijote la pagon de la ŝipo. Kun granda aplombo, kvazaŭ nenio estus okazinta, la kavaliro respondis, ke li tre volonte pagus la boaton, nur se oni redonus la liberon, sen ricevi kaŭcion, al la persono aŭ personoj subpremataj en la kastelo.

—Pri kiaj personoj kaj kastelo vi parolas, sencerba? — demandis unu muelisto—. Ĉu eble vi volas preni kun vi la homojn, kiuj venas mueligi sian tritikon ĉi tie?

—Jam sufiĉe! —diris en si don Quijote—. Provi atingi de ĉi friponoj, per suplikoj, ke ili faru ion decan, estus kvazaŭ prediki en dezerto. En ĉi aventuro certe du kuraĝaj sorĉistoj oponas unu la alian, kaj kion la unua klopodas fari, la dua detruas. La unua provizis min per la boato, la dua ĵetis min en la akvon. Dio nin helpu! En ĉi mondo ĉio konsistas el artifiko kaj maĥinacioj, unuj kontraŭ la aliaj. Mi povas fari nenion pli.

Kaj levante la voĉon, li diris, dum li rigardis la muelejojn:

—Nekonataj amikoj enfermitaj en ĉi prizono, pardonu min. Malfeliĉe por vi, kaj por mi, mi ne povas liberigi vin de via misfortuno. Ĉi aventuro sendube estas rezervita por alia kavaliro.

Tion dirante, li pagis, interkonsente kun la fiŝistoj, kvindek realojn por la boato; Sancho tre malgraŭvole transdonis ĉi sumon kaj diris:

—Du pliaj navigadoj kiel la nuna sendus nin kaj nian tutan kapitalon al la fundo.

La fiŝistoj kaj la muelistoj mire algapis al la du figuroj, tiel diferencaj de la ordinaraj homoj, kaj ne povis kompreni kion celis don Quijote per siaj demandoj kaj diroj. Fine, opiniante ilin frenezaj, la muelistoj reiris al siaj muelejoj, kaj la fiŝistoj al siaj kabanoj.

Don Quijote kaj Sancho ekiris returne al siaj bestoj kaj al siaj bestumadoj. Kaj ĉi finon havis la aventuro de la ensorcĉita boato.

[306] T.e. kiam oni estas obea al superulo, oni konkeras lian favoron.

[307] Sancho miskomprenas kaj diras «noca» anstataŭ «ekvinoksa».

[308] En la hispana, respektive, «invertito», «leprulo» kaj «pisulo».

Ĉapitro 30

Pri tio okazinta al don Quijote kun bela ĉasantino

Tre deprimitaj kaj mishumoraj reiris al siaj bestoj la kavaliro kaj la ŝildisto, speciale Sancho, ĉar, ĉiufoje kiam li devis tuŝi la monon, li sentis sin vundita en la koro, kaj ŝajnis al li, ke, kiom oni deprenas de la kapitalo, tiom oni deŝiras de liaj propraj pupiloj. Fine ili ekrajdis en silento kaj, apartiĝante de la fama rivero, don Quijote absorbiĝis en siaj amaj pensoj, kaj Sancho en siaj eblecoj de promocio, kiun li vidis tiam tute ekster lia atingo, ĉar, kvankam li estis stulta, li bone komprenis, ke la faroj de lia mastro konsistas, tute aŭ pliparte, el ekstravagancoj, kaj atendis la okazon eskapi kaj reiri hejmen, sen pliaj traktoj kun la hidalgo kaj sen diri al adiaŭ. Sed la destino aranĝis la aferojn tute male ol li imagis.

Okazis, ke en la sekvanta tago, ĉe la sunsubiro, elrajdante el arbaro, don Quijote ĵetis la rigardon al verda herbejo, ĉe kies fino vidiĝis kelkaj personoj. Li proksimiĝis kaj ekkonis, ke temas pri grupo de perfalkaj ĉasantoj. Li plu alrajdis kaj distingis inter ili gracie solenan damon sur tre blanka palefreno kun verda harniso kaj arĝenta flankselo. Ankaŭ ŝi portis verdan kostumon, tiel riĉan kaj elegantan, ke ŝi ŝajnis la enkorpiĝo de la eleganto mem. Sur ŝia liva mano sidis falko, kaj don Quijote konkludis el tio, ke sendube ŝi estas granda damo kaj eble la mastrino de la ceteraj ĉasantoj. Tiam li diris al Sancho:

—Rapidu, frato Sancho, alkuru diri al la sinjorino sur la palefreno kaj kun la falko, ke mi, la Kavaliro de la Leonoj, salutas ŝian grandan belon kaj ke, se ŝia moŝto min permesas, mi iros kisi ŝian manon kaj servi ŝin, ĝis la limoj

de mia forto, en ĉio, kion ŝi deziros ordoni. Zorgu, Sancho, kiel vi parolos, kaj gardu vin ne ŝovi ajnan el viaj proverboj en la mesaĝon.

—Ĉu vi bezonis averti min? —respondis Sancho—. Ĉu mi ne estas la ĝusta mesaĝisto? Ne por la unua fojo mi portus mesaĝon al altaj kaj grandaj damoj!

—Se escepti la mesaĝon al sinjorino Dulcinea, mi ne scias, ke vi portis alian, almenaŭ de kiam vi servas min —diris don Quijote.

—Vi pravas —respondis Sancho—. Sed «bona paganto volonte donas garantiaĵon» kaj «en domo abunde provizita baldaŭ kuiriĝas la manĝo»; mi volas diri, ke mi ne bezonas, ke oni diru aŭ avertu al mi, kion mi devas fari: mi taŭgas por ĉio, kaj pri ĉio mi konas iomete.

—Sendube, Sancho —diris don Quijote—. Iru do, kaj Dio vin gvidu!

Sancho ektritis, urĝante la azenon akceli sian kutiman paŝadon, iris ĝis la bela ĉasistino, deseliĝis antaŭ ŝi, dirante:

—Bela sinjorino, la kavaliro tie videbla, alnomata «Kavaliro de la Leonoj», estas mia mastro; mi, lia ŝildisto, kaj ĉe mi oni min nomas Sancho Panza. Ĉi Kavaliro de la Leonoj, antaŭ nelonge nomata Kavaliro de la Trista Mieno, sendas min, ke mi diru al Via Grandeco, ke, se vi konsentas, aprobas kaj bonvolas, li pretas veni plenumi sian deziron servi vian senegale majestan kaj belan personon, kiel li diras kaj mi konfirmas. Donante vian permeson, via sinjorina moŝto faros ion, kio kreskigos vian famon, kaj li ricevos grandegan favoron kaj kontenton.

—Vere, brava ŝildisto —respondis la sinjorino—, vi komunikis la mesaĝon laŭ la reguloj propraj al ĉi okazoj. Relevu vin, ĉar

ne justas, ke la ŝildisto de eminentulo kiel la Kavaliro de la Trista Mieno, kies famon ni bone konas ĉi tie, restu surgenua; relevu vin, amiko, kaj diru al via mastro, ke li estos plej bonvena, se li venos servi min kaj la dukon, mian edzon, en nia kampara domo, proksima al ĉi tie.

Sancho relevis sin, tiel same impresita de la belo de la damo, kiel de ŝia bona edukiteco kaj ĝentilo; sed eĉ pli impresis lin, ke ŝi konas la historion de lia mastro, la Kavaliro de la Trista Mieno. Kaj Sancho imagis, ke ŝi ne nomis la hidalgon Kavaliro de la Leonoj, eble pro tio, ke ĉi lastan nomon li donis al si antaŭ tre eta tempo.

La dukino, kies nomon oni ne scias ankoraŭ, demandis lin:

—Diru, frato ŝildisto. Ĉu via mastro ne estas la sama, pri kiu oni eldonis unu libron titolitan *La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha*, kaj en kies koro regas certa Dulcinea de El Toboso?

—Jes, li estas —respondis Sancho—. Kaj lia ŝildisto, nomata Sancho Panza, kiu troviĝas, aŭ devus troviĝi, en la sama libro, estas mi mem, se oni ne ŝanĝis min en la lulilo, mi volas diri, en la presejo.

—Mi sentas min tre kontenta je viaj informoj —diris la dukino—. Iru, frato Sancho, kaj sciigu al via mastro, ke mi bonvenigos lin en mia lando, kaj ke nenio donus al mi tiel multe da plezuro kiel lia vizito.

Sancho, plena de ĝojo kaŭze de tiel agrabla respondo, reiris al sia mastro kaj rakontis al li kion diris la granda sinjorino, kies belon, ĝentilon kaj simpatian li levis per siaj rustikaj laŭdoj ĝis la ĉielo. Don Quijote brustoŝvelis sur la selo, sin firme apogis sur la piedingoj, ĝustigis al si la vizieron, pikis la ĉevalon per la spronoj kaj avancis kun ĝentila senĝeno por kisi la manon de la dukino; dume, vokinte sian edzon, la

dukon, ŝi ripetis al li la mesaĝon de Sancho. La gedukoj jam legis la unuan parton de ĉi historio kaj sekve konis la absurdan humoron de don Quijote; tiel do, ili atendis lin kun la plej granda plezuro, tre deziris persone koni lin, intencis agordiĝi kun liaj fantazioj, aprobi ĉion, kion li dirus, trakti lin kiel vagantan kavaliron dum lia restado ĉe ili, kaj observi la ceremoniaron ordinare priskribitan en la kavaliraj libroj, kiujn ili legadis kaj eĉ tre ŝatis.

Ĉe tio alvenis don Quijote kun la viziero levita, faris mienon kvazaŭ li volus deseliĝi, kaj tiam Sancho alrajdis teni lian piedingon. Sed, misŝance, kiam la ŝildisto estis saltanta de la azeno, lia piedo kroĉiĝis al ŝnuro de la ŝarĝo-selo, tiel, kie li tute ne povis dekroĉi sin: kontraŭe, li pendis de la ŝnuro kun la buŝo kaj la brusto sur la tero. Don Quijote, ne kutimis deseliĝi, sen ke oni tenus lian piedingon, kaj pensante, ke Sancho jam faras tion, delasis sin kun sia tuta pezo, kaj trenis post si la selon, sendube misligitan, de Rocinante. Tiel do, li kaj lia selo falis surteren, ne sen granda honto de la hidalgo, kiu murmuris tra la dentoj multe da sakroj kontraŭ la povra Sancho, kies piedo teniĝis ankoraŭ kroĉita al la ŝnuro.

La ĉasantoj, ordonite de la duko, helpis la kavaliron kaj ties ŝildiston, levis la hidalgon, kiu, ankoraŭ muelita por la falo, iris lamante, kaj kiel li povis, genuiĝis antaŭ la paro. Sed la duko tute ne konsentis la geston de la hidalgo. Kontraŭe, li descendis de la ĉevalo kaj brakumis lin, dirante:

—Mi tre bedaŭras, sinjoro Kavaliro de la Trista Mieno, ke via unua paŝo sur mia lando estis tiel misfortuna. Sed la preteratentoj de la ŝildistoj ofte kaŭzas eĉ pli mavajn akcidentojn.

—Ĉi okazo koni vin, kuraĝa princo —respondis don Quijote —, ne estus mava eĉ se mia falo ne ĉesus ĝis la profundo de

la infero: eĉ de tie relevus kaj savus min la feliĉo vin vidi. Mia ŝildisto —Dio lin damnu— scias pli bone deligi sian langon por diri insolentojn, ol firme alligi selon. Sed en ajna pozicio, kuŝe aŭ stare, piede aŭ rajde, mi ĉiam estos je via servo kaj je la servo de mia sinjorino la dukino, inda edzino via, princino de la belo kaj universala reĝino de la ĝentilo.

—Pli modere, sinjoro don Quijote de La Mancha! —diris la duko—. Kie ekzistas sinjorino doña Dulcinea de El Toboso, tie oni ne devus laŭdi alies belecon.

Ĉe tio, Sancho jam dekroĉis sian piedon de la ŝnuro kaj tial, ke li troviĝis apud sia mastro, intervenis, antaŭ ol don Quijote povus respondi:

—Oni devas, ne nei, sed aserti, ke nia sinjorino Dulcinea de El Toboso estas tre bela. Sed la leporoj saltas en la plej neatendita momento, kaj mi iam aŭdis diri, ke la tiel nomata Naturo similas al potisto, kiu modlas vazojn el argilo; kaj la faranto de unu bela vazo, povas modli ankaŭ du cent aŭ tri cent tiajn. Mi diras tion, ĉar la belo de mia sinjorino la dukino eĉ ne ete staras post la belo de mia mastrino kaj sinjorino Dulcinea de El Toboso.

Don Quijote sin turnis al la dukino kaj diris:

—Via Grandeco povas facile imagi, ke en la mondo nenia kavaliro povus iam teni ŝildiston pli paroleman kaj ŝerceman ol la mian; kaj li mem pruvos la pravon de mia aserto, se via sublima moŝto permesas, ke mi servu vin dum kelkaj tagoj.

—Tre plaĉas al mi, ke ĉi brava Sancho ŝatas ŝerci —respondis la dukino—, ĉar tio montras, ke li havas saĝan naturon. Kiel vi bone scias, sinjoro don Quijote, la sprito kaj la humuro ne sidas en obtuzaj cerboj; kaj tial, ke la bona Sancho estas amuza kaj inĝenia, de nun mi konsideras lin homo saĝa.

—Kaj parolema —aldonis don Quijote.

—Des pli bone —diris la duko—, ĉar oni ne povas diri multe da spritaĵoj per nur kelkaj vortoj. Sed, de nia flanko, ni ne perdu la tempon parolante. Venu la granda Kavaliro de la Trista Mieno al...

—Via Alteco devus diri Kavaliro de la Leonoj —interrompis Sancho—. Jam ne plu ekzistas trista mieno.

—Nu, la sinjoro Kavaliro de la Leonoj venu al mia kastelo staranta proksime; tie oni vin regalos, kiel eminenta persono meritas, kaj kiel mi kaj la dukino ordinare regalas la vagantajn kavalirojn, kiuj vizitas nin.

Ĉe tio, Sancho jam metis kaj firme alligis la selon al Rocinante; don Quijote grimpis sur ĝin, la duko sur sian belan ĉevalon, la dukino ekrajdis inter la du viroj, kaj la grupo iris ale al la kastelo. La dukino petis Sanchon teniĝi apud ŝi, ĉar ŝi ege ŝatis aŭdi liajn saĝajn dirojn. La ŝildisto ne bezonis, ke oni ripetu duafoje la inviton, do li sin miksis kun la tri homoj kaj, kiel kvara en la grupo, intervenis en la babilado, ĉe la granda plezuro de la gedukoj, feliĉaj akcepti en sian kastelon ĉi vagantan kavaliro kaj ĉi misagantan ŝildiston.

Ĉapitro 31

Pri multaj kaj gravaj aferoj

Sancho sentis profundan ĝojon, ĉar en siaj pensoj li vidis sin ĝuante la favoron de la dukino, kaj imagis, ke li trovus en ŝia kastelo kiom li trovis ĉe don Diego kaj ĉe Basilio. Al li tre plaĉis la bona vivado, sekve, li kaptis la ŝancon je la haroj, ĉiufoje kiam ĝi prezentis al li la okazon regali sin.

Rakontas do la historio, ke, antaŭ ol ili atingis la palacon aŭ kampo-domon, la duko antaŭiĝis kaj instrukciis al siaj servistoj, kiel ili traktu la hidalgon. Kiam ĉi lasta alvenis kun la dukino al la pordoj de la kastelo, tuj eliris du lakeoj aŭ palefrenistoj, vestitaj ĝis la piedoj per speco de ĉambro-robo el ege fajna sateno skarлата, subite prenis la hidalgon inter siaj brakoj, deĉevaligis lin kaj diris:

—Via Grandeco iru helpi nian sinjorinon descendi de la palefreno.

Don Quijote tion pretis fari, kaj li kaj la damo interŝanĝis grandan nombron da ĝentilaj komplimentoj, ĝis fine la dukino venkis en sia insisto descendi de la ĉevalo nun en la brakoj de sia edzo, dirante, ke ŝi ne konsideras sin inda meti tiel neutilan ŝarĝon sur tiel faman kavaliron. Tiam, la duko helpis ŝin deĉevaliĝi kaj, kiam ili eniris en grandan korton, proksimiĝis du belaj puceloj kaj ĉirkaŭmetis sur la ŝultrojn de don Quijote grandan mantelon skarlatan. Subite la galerioj de la korto pleniĝis per servistoj kaj servistinoj de la gedukoj, kiuj laŭte kriis:

—Bonvenon al la floro kaj kremo de la vaganta kavalirismo!

Kaj dume, ili ĉiuj, aŭ la pliparto, verŝis parfumitan akvon sur don Quijote kaj la gedukojn, ĉe la granda miro de la hidalgo. Kaj tiam, per la unua fojo, li firme kaj sendube kredis, ke li estas, ne imaga, sed vera vaganta kavaliro, tial, ke li vidas sin traktata, same kiel oni traktis la kavalirojn de pasintaj epokoj, laŭ la rakontoj de liaj libroj.

Sancho forlasis sian azenon kaj, sin kroĉante al la dukino, eniris en la kastelon. Sed li sentis rimorson, tial, ke li lasis la azenon sola, do li proksimiĝis al respektinda duenjo, tie staranta kun aliaj por akcepti la dukinon, kaj sufloris al ŝi:

—Sinjorino González, aŭ kiel ajn vi nomiĝas...

—Sinjorino Rodríguez de Grijalba estas mia nomo — respondis la duenjo—. Kion vi deziras, frato?

—Ĉu via moŝto bonvolus iri al la pordo de la kastelo? Tie vi trovos mian grizan azenon. Estu tiel kompleza konduki, aŭ kondukigi ĝin, al la stalo, ĉar la povra besto iom timemas kaj ne havas la kutimon resti sola eĉ unu solan momenton.

—Se la mastro posedas la saman edukitecon kiel la servisto —respondis la duenjo—, bela plago falis sur nin! Velu for, frato, iru al la diablo kun la persono, kiu prenis vin ĉi tien. Kaj vi mem zorgu vian azenon. La duenjoj de ĉi domo ne kutimas dediĉi sin al tiaj taskoj.

—Tamen —diris Sancho— mi aŭdis mian mastron rakonti (kaj li estas ĝisfunda konanto de historioj) tion pri Lanceloto:

Ĵus venintan de Britlando
lin regalis la puceloj;
la princinoj la ĉevalon.

»Kaj, verdire, mi ne ŝanĝus mian azenon por ĉevalo de sinjoro Lanceloto.

—Frato, se vi estas arlekeno —respondis la duenjo—, diru viajn ŝercojn kie oni trovas ilin amuzaj, kaj kie oni pagas al vi por ili. De mi nenion vi ricevos, se ne unu figon.^[309]

—Kaj tre maturan! —rebatis Sancho—. Via moŝto ne perdu la pezon de via aĝo, se vi fordonus la figon.

—Filo de putino! —ekriis la duenjo, jam tute ruĝa de kolero—. Se mi oldas aŭ ne, tio koncernas Dion, ne vin, fripono ajlo-gluta!

Ŝi parolis tiel laŭte, ke la dukino aŭdis ŝin, sin turnis kaj, vidante la duenjon ekscitita kaj kun fajraj okuloj, demandis al ŝi, ĉu ŝi disputas kun iu:

—Kun ĉi bonulo —respondis la duenjo—. Li petis min plej insiste, ke mi iru enstaligi lian azenon, kiu nun troviĝas ĉe la pordo de la kastelo, kaj por pravigi sian peton, li diris, ke la samon oni faris ie, ke damoj regalis ian Lanceloton, kaj duenjoj lian ĉevalon, kaj eĉ plie, li nomis min olda.

—Tiom mi konsiderus la pleja insulto ebla —diris la dukino.

Ŝi turnis sin al Sancho kaj diris al li aparte:

—Sciu, amiko Sancho ke doña Rodríguez tre junas, kaj ke ŝi portas kufon, ne pro sia aĝo, sed kaŭze de sia rango kaj de la nuna modo.

—Aĉe mi vivu la ceteron de mia vivo —respondis Sancho— se mi parolis al ŝi kun malica intenco. Mi diris kion mi diris, nur ĉar mi tre amas mian azenon kaj pensis, ke mi ne povus konfidi ĝin al persono pli bonkora ol doña Rodríguez.

Don Quijote, ĉion aŭskultinte, diris:

—Ĉu vi pensas, Sancho, ke vi troviĝas en konvena loko por paroli pri tiaj aferoj?

—Sinjoro —respondis Sancho— ĉiu devas zorgi pri siaj propraj aferoj, kie ajn li troviĝas. Ĉi tie mi memoris la azenon, ĉi tie mi parolis pri ĝi, kaj se mi memorus ĝin en la stalo, tie mi parolus.

—Sancho pravas, kaj oni ne devas riproĉi lin —diris la duko—. Kaj li ne faru al si zorgojn; oni traktos la azenon kiel lian propran personon.

Ĉi konversacio amuzis ĉiun, krom don Quijote, kaj, tiel babilante, ili surpris la ŝtuparon kaj kondukis la hidalgon al salono, sur kies muroj pendis riĉaj tapiŝoj ore brokitaj. Ses puceloj prenis de li armaĵon kaj servis lin kiel paĝioj. Jam antaŭe la ses estis instruitaj de la gedukoj pri kiel li devus plenumi sian rolon, kaj kiel ili devus trakti la hidalgon, por ke li imagu kaj vidu, ke oni lin traktas kiel vagantan kavaliron. Jam sen la armaĵo, don Quijote montriĝis en sia strikta kuloto kaj en sia saĵo el ĉama ledo, kaj ĉe lia figuro magra, alta, longa kaj kun kavaj vangoj, la puceloj lin servantaj ne eksplodis per rido, ĉar ili penis ĝin reteni, obeante unu el la specialaj ordonoj de siaj gemastroj. La puceloj petis lian permeson nudigi lin por ŝanĝi al li la ĉemizon, sed li tute ne konsentis, dirante, ke la vagantaj kavaliroj tiel bezonas la pudoron kiel la kuraĝon. Tamen li petis ilin transdoni la ĉemizon al Sancho, kaj, enfermite sin kun li en unu ĉambro, kie staris riĉa lito, la hidalgo nudiĝis kaj surmetis la ĉemizon. Kaj vidante sin sola kun Sancho, li diris:

—Ĉu vi pensas, idioto iama kaj bufono nuna, ke oni rajtas ofendi kaj insulti tiel respektindan kaj dignan duenjon? Ĉu vi devis menciigi tiam la azenon? Ĉu la gesinjoroj de la kastelo kapablu neglekti la bestojn dum ili tiel ĝentile traktas iliajn

mastrojn? Je Dio, Sancho, regu vin, ne tiom montru la fadenon, ke oni ne vidu, ke vin oni teksis el rustika kaj kruda materialo. Pensu, pekanto, ke ju pli da honorindeco kaj bona eduko havas la servistoj, des pli da estimo ĝuas la mastroj, kaj ke unu el la plej grandaj avantaĝoj de la princoj super la aliaj homoj estas, ke ili utiligas la servojn de personoj tiel bonaj kiel ili mem. Ĉu vi ne komprenas, bruto, ke se oni trovos, ke vi estas kruda kampulo aŭ ŝercema idioto, oni pensos, ve al mi!, ke mi estas ia fripona ĉarlatano? Ne, Sancho amiko, ne: absolute necesas, ke vi konduku pli takte, ĉar, se vi insistas tro paroli kaj spritaĉi, vi falos ĉe via unua stumblo kaj turniĝos en mizeran bufonon. Retenu la langon, konsideru kaj remaĉu ĉiun vorton, antaŭ ol ili eliros el via buŝo, kaj ne forgesu, ke ni alvenis al loko, kie dank' al Dio kaj al la forto de mia brako, mi kreskigos multoble nian famon kaj havon.

Sancho plej serioze promesis kudri al si la buŝon aŭ mordi sian langon, kiel ordonite, prefere ol diri ajnan vorton misan aŭ nekonvenan. Li aldonis, ke lia mastro ne devus timi ĉirilate, ĉar oni neniam divenos, kiaj ili estas pro la faroj aŭ diroj de la ŝildisto.

Don Quijote vestis sin, surmetis la balteon kun la glavo, ĵetis sur la ŝultrojn la skarlatan mantelon, surkapigis al si ĉapon el verda sateno, kiun la puceloj donis al li, kaj, tiel garnita, li eliris al la salono, kie la puceloj staris en du egalaj vicoj kaj pretis, laŭcele provizitaj, plenumi la formalajn lavi al li la manojn, kion ili faris meze de multaj ceremonioj kaj riverencoj. Poste, dek du paĝioj kun la butleroj^[310] alvenis por konduki lin al la manĝotablo, kie la gedukoj jam atendis. La paĝioj ĉirkaŭis lin, kaj pompe kaj majeste lin kondukis al alia salono, kie staris riĉe provizita tablo kun nur kvar servicoj. La duko kaj la dukino aliris al la pordo de la salono por akcepti la hidalgon. Kun la paro iris unu el tiuj solenaj klerikoj, kiuj mastrumas la domojn de la nobeloj; kiuj, ĉar ili

ne naskiĝis princoj, ne scias instrui al la veraj princoj, kiel kondukti princo; kiuj volas, ke la grandecon de la grandaj oni mezuru per ilia propra etanimeco; kiuj, dezirante instrui al ili moderon, turnas ilin en avarajn. Kiel dirite, tia certe estis la serioza kleriko alirinta kun la gedukoj akcepti la hidalgon. Post interŝanĝado de mil ĝentilaj komplimentoj, ili fine metis don Quijote en la mezon kaj reiris sidiĝi ĉe la tablo.

La duko invitis la kavaliron okupi la honoran lokon de la tablo kaj, kvankam don Quijote unue rifuzis, la duko tiel multe insistis, ke li fine cedis. La kleriko sidiĝis fronte al li, kaj la dukino kaj la duko ĉe liaj flankoj. Plena de miro kaj stuporo, Sancho gape observis ĉion kaj kiel ĉi nobeloj faras honoron al lia mastro. Kaj vidante kiom da komplimentoj kaj ceremonioj interŝanĝis la duko kaj don Quijote, por ke ĉi lasta sidiĝu ĉe la kapo de la tablo, li diris:

—Se viaj moŝtoj donus al mi permeson, mi rakontus ion okazintan en mia vilaĝo, aludan al ĉi afero de la sidlokoj.

Apenaŭ Sancho diris tion, don Quijote komencis tremi, kredante, ke la ŝildisto sendube rakontus alian novan idiotaĵon. Sancho lin rigardis, divenis lian anim-staton kaj diris:

—Ne timu, sinjoro, ke mi devios aŭ diros ion ne tre konvenan, ĉar mi ne forgesis vian ĵusan konsilon pri la afero paroli multe aŭ ete, bone aŭ mave.

—Nenion tian mi memoras, Sancho —respondis don Quijote —. Diru kion vi volas, kondiĉe, ke vi finos baldaŭ.

—Nu mi volas diri ion tiel veran, ke mia mastro, sidanta ĉi tie, ne povos nomi min mensoga.

—Kion min koncernas, vi povas mensogi laŭplaĉe — respondis don Quijote—. Mi ne detenos vin. Sed zorgu kion

vi diros.

—Mi tiel multe konsideris kaj rekonsideris la aferon, ke mi sentas min tiel sekura, kiel la ulo, kiu sidas en la turo kaj donas la alarmon.^[311] Vi mem vidos, ke mi pravas, kiam vi aŭskultos la rakonton.

—Estu pli bone —diris don Quijote—, se Viaj Grandecoj ordonus ĉi idioton foriri de ĉi tie; alie, li diros mil stultaĵojn.

—Jen la vivo de mia edzo! —ekkriis la dukino—. Sancho ne apartiĝu de mi eĉ unu colon. Mi amas lin, ĉar mi scias, ke li estas tre prudenta.

—Via sankta moŝto vivu prudentan vivon pro via bona opinio pri mi, kvankam mi ne meritas ĝin —respondis Sancho—. Nu, jen la rakonto: Unu hidalgo de mia vilaĝo, hidalgo tre riĉa kaj grava, ĉar li devenis de la familio Álamos, de Medina del Campo, kaj edziĝis al doña Mencía de Quiñones, filino de don Alonso de Martañón, kavaliro de la ordeno de Santiago, droninta en la Herradura,^[312] kaj antaŭ kelkaj jaroj, kaŭzo de la disputo okazinta en nia vilaĝo, kun interveno, laŭ mia scio, de mia sinjoro don Quijote, kaj kie ricevis vundon Tomás la petola, filo de la forĝisto Balbastro... Ĉu ĉio ĉi ne veras, sinjoro? Diru, ke jes, je via vivo, por ke ĉi sinjoroj ne kredis, ke mi estas parolema kaj mensoga.

—Ĝis nun —rimarkis la kleriko— mi kredas vin pli parolema ol mensoga; sed mi ne scias kion mi opinios poste.

—Vi citas tiom da atestantoj, Sancho, kaj donas tiom da informoj, ke mi ne povas diri, ke vi ne diras la veron —komentis don Quijote—. Sed daŭrigu kaj rakontu vian historion per malpli da vortoj, ĉar, laŭ via ĝisnuna stilo, vi ne finus en du tagoj.

—Nenion li resumu —intervenis la dukino— se li volas fari al mi komplezon. Li devas diri la rakonton laŭ sia maniero, eĉ se li finus ĝin en ses tagoj; ĉar, kvankam li bezonus tiom da tempo, mi konsiderus ilin la plej bonaj tagoj de mia vivo.

—Nu, bone —daŭrigis Sancho—. Sciu, ke ĉi sama hidalgo (kaj mi konas lin kiel mian poŝon, ĉar lia domo distancas de la mia unu sagoĵeton) invitis manĝi paŭperan, sed bonstatan kampulon.

—Pli rapide, frato —interrompis la kleriko—. Per tiaj paŝetoj, vi alvenos al la fino de la rakonto jam en la transa mondo.

—Se al Dio plaĉos, mi haltos iom antaŭ la unua duono de la vojo —respondis Sancho—. Nu, bone, ĉi sama kampulo alvenis al la domo de la invitanta hidalgo kies animo ripozu en paco, ĉar li mortis, kaj, laŭdire, li mortis ege pie, kiel anĝelo. Nu, mi ne troviĝis tiam en la vilaĝo, ĉar antaŭe mi iris falĉi al Tembleque...

—Jen via vivo, filo, tuj revenu de Tembleque —diris la kleriko — kaj, sen enterigi la hidalgon (se vi ne volas ĉeesti mian propran enterigon), finu vian rakonton.

—Nu do, okazis —daŭrigis Sancho— ke, kiam ili pretis sidiĝi ĉe la tablo, kaj ŝajnas al mi, ke mi vidas ilin nun pli realaj ol iam...

La dukon kaj la dukinon tre amuzis la evidenta ĉagreno de la bona kleriko ĉe la digresioj de Sancho kaj ĉe ties oftaj paŭzoj en la rakontado de la historio. Kaj don Quijote konsumiĝis de kolero kaj furiozo.

—Nu, bone —daŭrigis la ŝildisto—. Kiel dirite, la du viroj pretis sidiĝi ĉe la tablo, sed la kampulo insistis, ke la hidalgo okupu la honoran lokon, kaj la hidalgo, de sia flanko, same obstinis, ke tion faru la kampulo, ĉar en lia hejmo oni devus

cedi al lia volo. Sed la kampulo, kiu esti ĝentila kaj bone edukita, absolute rifuzis, ĝis la hidalgo, furioza, metis la manojn sur la ŝultrojn de la alia, sidigis lin perforte kaj diris: «Sidiĝu, ŝtipo, ĉar, kie ajn mi sidiĝos, mi okupos la honoran lokon». Nu, tia estas la historio, kaj mi vere kredas, ke mi rakontis ĝin en la ĝusta konvena momento.

La vizaĝo de don Quijote ricevis mil kolorojn, kaj sur lia bruna haŭto ili montriĝis kiel jaspecaj makuloj. La gedukoj kaptinte la malican intencon de Sancho, retenis la ridon, ĉar ili timis, ke don Quijote fine eksplodus de furiozo. Por ŝanĝi la konversacion, kaj por ke Sancho ne plu impertinentu, la dukino demandis al don Quijote, ĉu li scias ion novan pri sinjorino Dulcinea, kaj ĉu li sendis al ŝi lastatempe ian giganton aŭ latronon kiel donacon, ĉar certe li venkis multe da ili.

—Sinjorino —respondis don Quijote—, miaj misfortunoj havis komencon sed ne finon. Gigantojn mi venkis, kaj latronojn mi sendis al ŝi. Sed, kie ili povus trovi ŝin, se konsideri, ke oni ŝin ensorcis kaj transformis en la plej turpan kampulinon imageblan?

—Mi ne scias —intervenis Sancho—. Ŝi ŝajnas al mi la plej bela virino de la mondo kaj, almenaŭ rilate al saltoj kaj kaprioloj, nenia akrobato povus konkuri kun ŝi. Verdire, sinjorino dukino, ŝi saltas de la tero ĝis sur la azeno tiel facile kiel kato.

—Ĉu vi vidis ŝin ensorcita, Sancho? —demandis la duko.

—Ĉu mi? Kompreneble! —respondis la ŝildisto—. Je la diablo, kiu, se ne mi, pensis la unua pri la afero de ĉi ensorcito? Ŝi estas tiel ensorcita kiel mia patro!

Kiam la kleriko aŭdis paroli pri gigantoj, latronoj kaj ensorcitoj, li suspektis, ke antaŭ li sidas don Quijote de La

Mancha, kies historion la duko ofte legis, malgraŭ ke li riproĉis multfoje lian ekstravagancan inklinon legi tiom da ekstravagancoj. Kiam lia suspekto konfirmiĝis, la kleriko, kun granda kolero, diris aparte al la duko:

—Via Ekscelenco, sinjoro, devos iam respondi antaŭ Dio pri la faroj de ĉi bonulo. Mi pensas, ke ĉi don Quijote, aŭ don Idioto, aŭ kiel ajn li nomiĝas, ne estas ankoraŭ tiel stulta kiel Via Ekscelenco deziras, ĉar vi donas la li ĉian okazon, por ke li iri ĝis la ekstremo de siaj absurdoj kaj sensencaĵoj.

Poste, turnante sin al don Quijote, li daŭrigis:

—Kaj vi, simplulo... Kiu batis al vi en la kapon, ke vi estas vaganta kavaliro kaj venkas gigantojn kaj kaptas latronojn? Faru kion vi devas, kaj la sorto vin akompanu: reiru al via hejmo, zorgu pri viaj filoj, se vi havas ilin, mastrumu vian bienon, kaj ne plu vagabondu tra la mondo, glutante venton kaj turnante vin en rid-objekton de konatoj kaj eĉ de nekonatoj. Kie, kaj en kia aĉa momento, vi lernis, ke ekzistis aŭ ekzistas vagantaj kavaliroj? Kie ekzistas gigantoj en Hispanujo, aŭ latronoj en La Mancha, aŭ Dulcineaj ensorĉitaj, aŭ la ridinda aro de ceteraj absurdoj al vi atribuitaj?

Don Quijote tre atente aŭskultis la vortoj de la respektinda kleriko, kaj vidante, ke li ĉesis paroli, la hidalgo, senrigarde al la duko kaj la dukino, stariĝis kun furioza gesto kaj kolera vizaĝo, kaj diris...

Sed lia respondo meritas apartan ĉapitron.

[309] La duenjo parolas pri insulta gesto. «Fari figon» konsistis en tio, levi la dikan fingron inter la eta kaj la

montra de fermita mano. La respondo de Sancho havas seksan intencon.

[310] Hispane «maestresala». Ĉefservisto respondeca pri ĉio rilata al la priservo de la tablo en la nobelaj domoj.

[311] Sancho aludas tion, ke de la gvatoturoj oni povis vidi la malamikojn, kiam ili elŝipiĝis. Tiam la gvatistoj donis tuj la alarmon, sed ili ne estis en danĝero, ĉar ŝirmitaj de la turoj.

[312] Terura ŝiprompo okazis ĉirkaŭ la jaro 1562 ĉe la haveno La Herradura (Málaga) kie, sekve de furioza tempesto, pereis pli ol 4000 personoj, inkluzive la generalo de galeroj don Juan de Mendoza.

Ĉapitro 32

Pri la repliko de don Quijote al lia admonanto kaj pri aliaj gravaj kaj amuzaj eventoj

Tiel do, stare, tremante de la kapo ĝis la piedoj, kiel vera hidrargo, don Quijote diris balbute, kun sinpela lango:

—La loko, kie mi troviĝas, la ĉeesto de la personoj, antaŭ kiuj mi staras, kaj la fakto, ke mi respektas kaj ĉiam respektis kion via ekleziula stato reprezentas, retenas kaj ligas la manojn de mia justa indigno. Tiel do, pro ĉi motivoj, kaj ankaŭ pro tio, ke, kiel sciante, la armo de la viroj en sutano kaj talaro, estas la sama armo de la virinoj, nome, la lango, mi uzos la mian por fronti, per egalaj bataliloj, kontraŭ vi, de kies stato oni devus atendi ne infamian insultadon, sed bonan konsilon. La riproĉoj bonintencaj kaj piaj postulas aliajn cirkonstancojn kaj alian trakton, dum la admonoj akraj kaj publikaj trapasas la limon de la justa kritiko, ĉar ĉi lasta havas kiel bazon, ne la aspron, sed la ĝentilon, kaj ne decas, kiam oni ne konas la pekon, senplie deklari la pekanton ŝtipo kaj idioto. Pri kia stultaĵo mi kulpas, ke vi riproĉas kaj kondamnas min, kaj ordonas, ke mi iru hejmen mastrumi mian bienon kaj zorgi pri miaj edzino kaj filoj, kvankam vi ne scias, ĉu mi estas edzo kaj patro? Ĉu sufiĉas eduki sin en mizeraj vivkondiĉoj, koni de la mondo nur la sesdek aŭ sepdek mejlojn de la distrikto, eniri senplie en alies domon kaj regi super ties mastro, por arogi al si juĝi pri la leĝoj de la kavalirismo kaj pri la vagantaj kavaliroj? Ĉu vere oni vane pasigas la tempon, kiam oni vagas tra la mondo serĉante, ne ties plezurojn, sed la rigorojn, kiuj kondukas la virtan homon al la eterna vivo? Se la kavaliroj, la nobeloj, la homoj grand-animaj kaj de moŝta nasko

konsiderus min idioto, mi sentus min netolereble ofendita; sed ke la letruloj opiniu min freneza, lasas min absolute indiferenta, ĉar ili neniam iris sur la pado de la kavalirismo. Mi estas kavaliro, kaj mortos kavaliro, se la Altega permesos. Kelkaj personoj movas sin sur la vasta kampo de la orgojla ambicio; aliaj, sur la vojo de la basa kaj servila flatado; aliaj, de la trompa hipokrito; kaj kelkaj, de la vera religio. Sed mi, sub la influo de mia stelo, iras sur la streta pado de la vaganta kavalirismo, kies principoj instruas min disdegni la havon, sed ne la honoron. Mi riparis arbitrojn, korektis misojn, punis insolentojn, venkis gigantojn kaj submetis monstrojn; mi amas virinon, nur ĉar la vagantaj kavaliroj nepre devas ami; tamen, mi estas, ne lasciva, sed ĉasta kaj platona amanto. Mi ĉiam celas la virton, t.e. fari bonon, ne mavon. Kaj se la persono kun tiaj penso, celo kaj konduto meritas la nomon de idioto, tion decidu Viaj Ekscelencoj, noblaj duko kaj dukino.

—Brave, je Dio! —kriis Sancho—. Diru nenion plian por via defendo, ĉar ne eblas pli diri, pensi aŭ fari. Kaj tial, ke ĉi sinjoro negas la ekziston pasean aŭ nunan de la vagantaj kavaliroj, oni ne devas miri, ke li ne scias kion li parolas.

—Ĉu eble vi estas, frato, tiu konata Sancho Panza, kies mastro promesis insulon al li? —demandis la kleriko.

—Jes, mi mem —respondis la ŝildisto—, kaj la insulon mi meritas tiel multe kiel alia ajn persono en la mondo. Kaj sciu, al mi bone sidas tio pri: «Iru kun la bonaj, ankaŭ vi estos bona», kaj «kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas» kaj «se bonan arbon vi elektas, bona ombro vin protektas». Mi elektis bonan sinjoron, mi akompanas lin jam de multaj monatoj, kaj, se Dio volos, mi estos kiel li. Mi kaj li vivu, kaj ne mankos al li la okazo regi imperion, nek al mi estri insulon.

—Sendube ne, amiko Sancho —diris tiam la duko—, ĉar, je la nomo de don Quijote, mi nomas vin gubernatoro de unu insulo, al mi ne necesa, tamen ne de eta valoro.

—Genuiĝu, Sancho —ordonis don Quijote—, kaj kisu la piedon de Lia Ekscelenco por danki lian favoron.

Sancho obeis, kaj la kleriko stariĝis kolera de ĉe la tablo, dirante:

—Je ĉi sutano mia, mi devas diri, ke Via Ekscelenco tiel stultas kiel ĉi pekantoj. Kiel ili povus ne ekstravaganci, se la mense sanaj stimulas ilian frenezon? Via Ekscelenco restu kun ili, sed, dum ili loĝos en ĉi domo, mi sidos en la mia kaj detenos min riproĉi kion mi ne povas eviti.

Kaj, sen diri aŭ manĝi ion plian, li foriris ignorante la suplikojn de la gedukoj, ke li restu; vere, la duko apenaŭ insistis, ĉar li tiom ridis kaŭze de la impertinenta kolero de la kleriko, ke li preskaŭ ne povis paroli. Fine li ĉesis ridi kaj diris al don Quijote:

—Tiel noble vi respondis, sinjoro Kavaliro de la Leonoj, ke vi ne bezonas, ke li donu al vi kontentigon. Eĉ se liaj vortoj ŝajnis ofendaj, ili ne estis tiaj, ĉar, same kiel la virinoj, ankaŭ ne la ekleziuloj povas ofendi, kiel via moŝto certe scias pli bone ol mi.

—Vi pravas —respondis don Quijote—. Kaj tio venas de la fakto, ke la ne ofendebla ne povas ofendi. La virinoj, infanoj kaj ekleziuloj ne povas defendi sin, eĉ se oni ilin atakas, sekve ne povas ricevi ofendon. Kiel Via Ekscelenco bone scias, inter la insulto kaj la ofendo ekzistas la diferenco, ke la ofendo venas de la persono kapabla ĝin fari kaj subteni, dum la insulto povas veni de iu ajn kaj ne necese kunportas ofendon. Por ekzemplo, unu persono iras senzorge sur la strato, lin alsaltas dek armitaj viroj kaj batas lin; li elingas

sian glavon kaj pretas laŭdeve sin defendi, sed la pli granda nombro de liaj malamikoj lin superas kaj ne permesas, ke li venĝu sin; ĉi viro do ricevis insulton, sed ne ofendon. Kaj jen alia konfirma ekzemplo: unu persono piediras, alia venas deposte, batas lin, tuj sekve forkuras, la batito persekutas lin, sed ne atingas lin. Tiam, la ricevinto de la batoj ricevis insulton, sed ne ofendon, ĉar la ofendo devas esti persista. Se la batinto, eĉ se li batis perfide, elingus sian glavon kaj alfrontus sian malamikon, ĉi lasta ricevus samtempe insulton kaj ofendon: insulton, ĉar oni lin batis perfide; ofendon, ĉar la batinto confirmis sian faron ne turnante la dorson kaj tenante sin defia. Tiel do, laŭ la reguloj de la damninda duelo mi ricevis insulton, sed ne ofendon. La infanoj ne havas maturan konscion; la virinoj ne povas forkuri nek havas motivon por ataki, kaj en la samaj cirkonstancoj troviĝas la religiuloj. Al ĉi tri specoj de homoj mankas atakaj kaj defendaj rimedoj kaj, kvankam, kompreneble, ili devas defendi sin, ili ne povas ofendi pro sia stato. Antaŭ nelonge mi diris, ke mi ricevis insulton, sed nun mi diras, ke ne, ĉar, kiu ne povas ricevi ofendon, ne povas insulti de sia flanko; tial, mi nek devas senti min insultita, nek tia mi min sentas pro la vortoj diritaj de la bona kleriko. Mi bedaŭras nur, ke li ne atendis plu, do mi ne povis konvinki lin, ke li eraras pensante kaj dirante, ke ne ekzistis aŭ ekzistas en la mondo vagantaj kavaliroj. Se tion aŭdus Amadís, aŭ alia el la membroj de lia nekalkulebla familio, sendube lia moŝta kleriko kare pagus pro siaj vortoj.

—Certe jes! —interrompis Sancho—. Li ricevus hakon desupre kaj displitiĝus de la kapo ĝis la piedoj kiel granato aŭ kiel matura melono. Ne, sinjoroj, tiaj kavaliroj ne toleris, ke oni ilin tiklu. Je Dio, se Reinaldos de Montalbán aŭdus paroli la hometon, li donus al li sur la buŝon tian frapon, ke li ne plu parolus en tri jaroj! Li disputu kun ili kaj vidu, ĉu li povos eskapi el iliaj manoj!

La dukino ridis ĝislarme, aŭdante Sanchon paroli. Ŝi opiniis lin pli amuza kaj freneza ol lia mastro, kaj la samon opiniis en tiu tempo multaj personoj. Fine don Quijote tute trankviliĝis, finiĝis la manĝo, oni demetis la tablotukon, kaj eniris kvar puceloj: la unua kun arĝenta pelvo, la dua kun kruĉo el la sama metalo, la tria kun du riĉaj kaj blankaj mantukoj sur la ŝultro, kaj la kvara, kun la brakoj nudaj ĝis la kubutoj, portis en siaj blankaj manoj (sendube blankaj) rondan pecon de Napola sapo. La pucelo kun la pelvo metis ĝin senĝene kaj gracie sub la mentonon de don Quijote, dum la kavaliro, sen diri vorton, miris je tia ceremonio kaj pensis, ke en tiu lando ekzistas la kutimo lavi postmanĝe, ne la manojn, sed la barbon. Tiel do li elstreĉis sian mentonon kiom li povis; ĉe la sama momento komencis flui la akvo el la kruĉo, kaj la pucelo kun la sapo frotis al li la barbon, tiel energie, ke la sapo-ŝaŭmo, blanka kiel la neĝo, ŝmiris ne nur la barbon, sed la tutan vizaĝon de la obea don Quijote, tiom, ke li devis fermi la okulojn. La duko kaj la dukino, ne antaŭe informitaj pri ĉi farso, atendis por vidi, kian finon havos tiel eksterordinara lavado. Kiam la barbofrotita pucelo kovris lian vizaĝon per dika tavolo da ŝaŭmo, ŝi ŝajnis, ke mankas akvo, kaj petis la pucelon kun la kruĉo alporti pli, dirante, ke dume don Quijote atendos. La knabino eliris, kaj don Quijote vidiĝis kiel la plej stranga kaj ridinda figuro imagebla. La spektantoj —kaj ili estis multaj— rigardadis lin, kaj ĉe lia kolo duonulnon longa kaj pli ol ordinare bruna, liaj fermitaj okuloj kaj lia barbo plena de sapo, nur preskaŭ mirakle ili sukcesis reteni la ridon. La petolaj knabinoj tenis la okulojn nelevitaj kaj ne kuraĝis rigardi al siaj gemastroj, ambaŭ inklinaj furiozi kaj ridi ĉe la sama tempo, ĉar ili ne sciis kion fari, ĉu puni la knabinojn pro ties farso, aŭ ilin rekompenci pro la plezuro vidi don Quijote en tia stato. Revenis la pucelo kun la kruĉo, oni finis lavi la hidalgon, kaj poste la knabino kun la mantukoj zorge kaj longe viŝis lin. Poste la kvar puceloj faris samtempe grandan kaj profundan riverencon kaj pretis eliri; sed la duko, por eviti, ke don Quijote

eventuale suspektu la ŝercon, vokis la pucelon kun la pelvo kaj diris al ŝi:

—Venu, lavu min kaj zorgu, ke ne manku al vi akvo.

La knabino, sagaca kaj rapid-pensa, metis la pelvon al la duko, same kiel ŝi antaŭe faris al don Quijote, kaj la kvar puceloj rapide lin lavis, sapis kaj viŝis, lasis lin pura kaj seka, kaj retiris sin riverencante.

Poste oni sciis, ke la duko ĵuris puni ilin, se ili ne estus lin sapinta same kiel la hidalgon por tiamaniere diskrete korekti sian tro petolan iniciativon.

Sancho observis atente la ceremonion de tia lavado kaj murmuris tra la dentoj:

—Je Dio! Ĉu eble ekzistas en ĉi lando la kutimo lavi la barbon, ne nur al la kavaliroj, sed ankaŭ al la ŝildistoj? Ĉar, je mia animo, lavadon mi bezonas, kaj se oni razus min, mi duoble dankus la favoron.

—Kion vi grumblas, Sancho? —demandis la dukino.

—Mi diras, sinjorino, ke mi ĉiam aŭdis, ke en la palacoj de la nobeloj oni donas, post la manĝo, akvon al la manoj, sed ne sapon al la barboj. Tial konvenas vivi longe, ĉar oni multon vidas. Kvankam oni diras ankaŭ, ke «kiu longe vivas, longe suferas», tamen suferi unu el ĉi lavadoj donas pli da plezuro ol da aflikto.

—Ne faru al vi zorgojn, amiko Sancho —respondis la dukino —. Mi ordonos, ke miaj ĉambristinoj lavu vin, kaj eĉ lesivu vin, se necese.

—Ili limiĝu al la barboj, almenaŭ por la momento —diris Sancho—. Kun la tempo, Dio disponos ĉion ceteran.

—Butlero —ordonis la dukino—. Metu vin je la servo de la bona Sancho kaj ĉiel komplezu al li.

La butlero respondis, ke oni plej atente servos sinjoron Sancho, kaj li prenis kun si la ŝildiston por iri manĝi. Ĉe la tablo restis la gedukoj kaj don Quijote parolante pri multaj kaj diversaj aferoj, sed senescepte rilataj al la profesio de la armoj kaj al la vaganta kavalirismo. La dukino petis la hidalgon, ke tial, ke ŝajne li havas bonan memoron, li skizu kaj priskribu la belon kaj trajtojn de sinjorino Dulcinea de El Toboso, ĉar, laŭ la proklamoj de la famo, certe ŝi estas la plej ĉarma virino de la mondo kaj eĉ de La Mancha. Don Quijote suspiris, aŭdante la peton de la dukino, kaj respondis:

—Se mi povus elŝiri mian koron kaj meti ĝin sur pladon antaŭ la okuloj de Via Grandeco, mi ŝparus al mia lango la penon diri kion oni apenaŭ povus pentri per vortoj: en mia koro Via Ekscelenco vidus ŝin plene portretita. Kiel mi skizus kaj priskribus punkton post punkto kaj parton post parto la belon de la senegala Dulcinea? Plenumi tiel altan taskon pli meritas aliaj talentoj, ne mi; tia entrepreno apartenas al la penikoj de Parasio, Timanto kaj Apelo kaj al la ĉiziloj de Lisipo, necesaj por pentri ŝin sur tolon kaj por ĉizi ŝin en marmoron kaj bronzon, same kiel estus necesaj la retoriko cicerona kaj demostena por inde ŝin prikanti.

—Kion signifas «demostena», sinjoro don Quijote? — demandis la dukino—. Neniam antaŭe mi aŭdis tian vorton.

—Retoriko demostena —respondis la hidalgo— signifas «retoriko de Demosteno», same kiel retoriko cicerona aludas la retorikon de Cicerono. Ambaŭ rangis kiel la plej bonaj oratoroj de la mondo.

—Efektive —diris la duko—. Kaj, vi, sinjorino, faris ne tre brilan demandon. Sed, malgraŭ ĉio, sinjoro don Quijote, vi

farus al ni grandan komplezon, se vi priskribus ŝin al ni; eĉ se nur en ĝeneralaj linioj kaj sen detaloj, sendube vi pentrus ŝin tia, ke ŝin envidus la plej belaj virinoj.

—Tre volonte mi komplezus al vi, sed la misfortuno, antaŭ nelonge min frapinta, tiel forviŝis ŝian figuron el mia memoro, ke mi pli inklinas plori ol priskribi ŝin. Viaj Grandecoj sciu ke, antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi iris kisi ŝian manon kaj peti ŝian benon, permeson kaj bondeziron por ĉi tria eliro, mi trovis, ne ŝin, sed alian personon, ĉar oni ŝin ensorĉis kaj transformis de princino en kampulinon, de anĝelo en diablon, de bonodora en fetoran, de eleganta en krudan, de ĝentila en kaprioleman, de lumo en tenebron kaj fine, de Dulcinea de El Toboso en barbaran virinon de Sayago.

—Granda Dio! —ekkriis laŭte la duko—. Kiu povis fari tiel grandan malicaĵon? Kiu rabis de la mondo ĉi belon, ĉi gracion, ĉi virton, kiuj logis, ĉarmis kaj honoris la mondon?

—Kiu? —respondis don Quijote—. Kiu, se ne ia perversa kaj envia sorĉisto, el la multaj min persekutantaj? Ĉi damnita raso venis en la mondon por obskurigi kaj detruigi la gloron de la bonaj kaj por briligigi kaj ekzalti la farojn de la perversaj. Sorĉistoj persekutis min, kaj sorĉistoj min persekutas kaj persekutos, ĝis ili puŝos min kun miaj prodaĵoj en la profundan abismon de la forgeso. Ili frapas kaj vundas min en la parto plej sensiva, ĉar ŝteli de vaganta kavaliro ties damon signifas ŝteli la vidon de liaj okuloj, la nutron de lia korpo, kaj la lumon de la suno. Kaj mi diris ofte, kaj ripetas nun, ke vaganta kavaliro sen damo estas kiel arbo sen folioj, domo sen fundamento kaj ombro sen korpo.

—Ne pli direblas —komentis la dukino—. Tamen, se oni kredu la historion de sinjoro don Quijote, antaŭ nelonge aperintan en la mondo inter la ĝenerala aplaŭdo de la

homoj, oni devas konkludi, ke, se mi bone memoras, via moŝto neniam vidis sinjorinon Dulcinea, ke ĉi sinjorino ekzistas, ne en la mondo, sed en la fantazio, ke via moŝto kreis kaj generis ŝin en via cerbo kaj dotis ŝin per ĉiaj ĉarmoj kaj perfektaĵoj.

—Pri tio oni povus multe paroli —respondis don Quijote—. Dio scias, ĉu Dulcinea ekzistas aŭ ne en la mondo, aŭ ĉu ŝi apartenas aŭ ne al la fantazio. Kaj pri tiaj aferoj, ne eblas esplori ĝis la fundo. Mi ne kreis nek generis mian sinjorinon, kvankam mi imagas ŝin tia, kia devas esti virino dotita per la kvalitoj necesaj por famigi ŝin ĉie en la mondo: bela sen difektoj, digna sen orgojlo, amanta kun virto, bonvola ĉar ĝentila, ĝentila ĉar bone edukita, kaj, fine, de nobela nasko, ĉar la belo brilas kaj imponas en la virinoj kun moŝta sango pli intense ol en la ĉarmulinoj de humila deveno.

—Vi pravas —diris la duko—. Sed sinjoro don Quijote permesu al mi aldoni, ke el la legado de lia historio oni venas al la konkludo, ke, eĉ en la supozo, ke efektive ekzistas Dulcinea, en aŭ ekster El Toboso, kaj ke ŝi belas ĝisekstreme, kiel via moŝto ŝin pentras, tamen, rilate al la rango de sia familio, ŝi ne povas rivali kun Oriana, Alastrajarea, Madasima kaj aliaj similaj damoj, tre abundaj en la historioj, kiel vi bone scias.

—Al tio mi povas respondi —diris don Quijote—, ke Dulcinea estas filino de siaj faroj, ke la honesto moŝtigas la sangon, kaj ke pli estimindas humilo virta ol nobeleco perversa. Cetere, Dulcinea havas en sia blazono virton kaj belon, kaj ili kapablas levi ŝin al la rango de reĝino kun krono kaj scepro, kaj almenaŭ virtuale, se ne formale, fari eĉ pli grandajn miraklojn.

—Mi opinias, sinjoro don Quijote —respondis la dukino—, ke vi esprimas vin kun granda singardo, kun sondilo en la

mano, kiel oni ordinare diras. De nun mi kredas, kaj igos kredi la ceterajn personojn de ĉi domo, se necese eĉ la dukon, mian sinjoron, ke Dulcinea de El Toboso ekzistas, ke ŝi vivas hodiaŭ, ke ŝi estas bela kaj de nobela nasko, kaj ke ŝi meritas, ke kavaliro kiel don Quijote servas ŝin: pli grandan honoron mi ne kapablus imagi. Sed mi ne povas ne havi certan skrupulon kaj senti ioman antipation kontraŭ Sancho Panza. Jen la skrupulo: la historio rakontas, ke la menciita Sancho transdonis al Dulcinea unu leteron je la nomo de via moŝto, kiam ŝi kribradis sakon da tritiko, laŭdire tritiko blonda, se esti pli preciza. Nu, ĉi afero igas min dubi pri la moŝteco de ŝia familio.

—Sendube vi scias, sinjorino —respondis don Quijote—, ke, kaŭze de la malico de ia enviema sorĉisto, aŭ kaŭze de la nepenetrebla volo de la fato, ĉio, aŭ preskaŭ ĉio, al mi okazanta, tre diferencas de la ordinaraj aventuroj de la aliaj kavaliroj; kiel konate, inter la famaj kavaliroj, unuj posedis la kapablon esti imunaj kontraŭ la ensorĉoj; aliaj havis tiel duran karnon, ke ne eblis vundi ilin. Oni rakontas pri la fama Rolando, unu el la dek du paruloj de Francujo, ke nur la plando de lia liva piedo estis vundebla per sole la pinto de dika pinglo, ne per alia armo; sekve do, kiam en Roncesvalles vidis Bernardo del Carpio, ke li ne povus vundi lin per sia glavo, li levis lin de la tero inter siaj brakoj kaj sufokis lin ĝismorte, memorante, ke Herkulo tiel pereigis Anteon, ferocan giganton laŭdire generitan de la Tero. El ĉio ĉi mi konkludas, ke eble mi posedas unu el ĉi kapabloj, sed ne la kapablon ne ricevi vundojn, ĉar la sperto ofte montris al mi, ke mi havas karnon molan kaj tute penetreblan. Mi ankaŭ ne ĝuas imunon kontraŭ la ensorĉoj, tial, ke mi vidis min enfermita en unu kaĝo, kien eĉ la tuta mondo ne sukcesus enpuŝi min, se ne helpe de ensorĉo. Sed, ĉar mi liberigis min, mi kredas, ke nenia nova magio povos min damaĝi, kaj eble pro tio, la sorĉistoj, vidante ke ili ne povas uzi sian perversan arton kontraŭ mi, venĝas sin kontraŭ miaj

plej amataj personoj kaj volas preni de mi la vivon mistraktante Dulcinean. Tiel do, kiam mia ŝildisto iris al ŝi kun mia mesaĝo, ili transformis ŝin en kampulinon okupatan en la basa tasko kribri tritikon. Sed mi jam diris iam, ke ĉi tritiko estis nek blonda nek tritiko, sed orientaj perloj. Kaj kiel pruvo, ke mi ne eraris en mia opinio, mi volas diri al Viaj Grandecoj, ke, kiam antaŭ nelonge mi pasis tra El Toboso vojirante ĉi tien, mi tute ne povis renkonti la palacojn de Dulcinea, kaj ke, alian tagon, kiam Sancho, mia ŝildisto, vidis ŝin en ties vera figuro, la plej bela sur la tero, ŝi aperis antaŭ miaj okuloj kiel turpa kaj kruda kampulino kaj, krome, tute triviala en siaj esprimoj, malgraŭ ke ŝi estas modelo de diskreto en ĉi mondo. Nu, tial, ke la ensorĉoj ne efikas, nek povas efiki sur min, kiel mi ĵus indikis, ŝi estas la ensorĉita, la ofendita, la transformita, la metamorfozita kaj la ŝanĝita; miaj malamikoj venĝis sin en ŝia persono kontraŭ mi, kaj mi vivos en konstanta plorado, ĝis mi vidos ŝin repreni sian antaŭan staton. Tion mi diras, por ke oni ne atentu la babilojn de Sancho pri la kribrado de Dulcinea, ĉar, se oni transformis ŝin por mi, ne mirinde, ke oni metamorfozis ŝin por li. Dulcinea estas de moŝta nasko kaj apartenas al la multaj, bonaj kaj antikvaj familioj hidalgaj de El Toboso.^[313] Kaj dank' al la senegala Dulcinea, ŝia vilaĝo akiros famon kaj gloron en la futuraj tempoj, same kiel okazis al Trojo per Helena kaj al Hispanujo per La Cava, kvankam ŝi ĝuos pli bonan reputacion ol ĉi du virinoj. Aliflanke, Viaj Ekscelencoj sciu, ke Sancho estas unu el la plej amuzaj ŝildistoj, kiuj ĝis nun servis al vagantaj kavaliroj. Foj-foje liaj naivaj diroj tiel subtilas, ke oni sentas plezuron, demandante sin, ĉu li estas simpla aŭ sagaca; liaj malicoj rivelas lin fripono, kaj pro liaj preteratentoj oni povus preni lin por idioto. Ĉion li dubas, kaj ĉion li kredas. Kiam mi pensas, ke li falos ĝis la fundo de la stulteco, li subite relevas sin per kelkaj saĝaj vortoj ĝis la alta ĉielo. Fine mi ne ŝanĝus lin por alia ŝildisto, eĉ se aldone mi ricevus unu urbon. Mi dubas do, ĉu konvenus konfidi al li

la gubernatorecon, per kiu Via Grandeco lin favoris. Tamen mi rimarkis ĉe li ian kapablon pozitivan por ĉi aferoj gubernatoraj kaj, se oni iom preparus lin, li sukcesus en sia posteno tiel bone, kiel la reĝoj prosperas en siaj klopodoj kolekti impostojn. Cetere, la sperto delonge montras al ni, ke al gubernatoro ne necesas granda kapablo aŭ klero, ĉar oni facile trovas multe da ili preskaŭ analfabetaj kaj, tamen, ili regas kun takto kaj energio. La ĉefa afero estas, ke ili havu bonan intencon kaj la deziron juste kondukti, kiel okazas, por ekzemplo, ĉe gubernatoroj-kavaliroj, kiuj, manke de propra klero, helpas sin per asesoroj. Mi rekomendus mian ŝildiston ne akcepti subaĉetojn aŭ ignori la juston, kaj krome konsilus lin pri kelkaj aliaj aferetoj, kiujn mi gardas en mia brusto kaj siatempe sciigos al Sancho por ties bono, kaj por la bono de la insulo, kies regadon li plenumos.

La duko, la dukino kaj don Quijote alvenis al ĉi punkto de la konversacio, kaj tiam aŭdiĝis multe da voĉoj kaj granda tumulto en la palaco. Subite, Sancho eniris terurite en la salonon, portante sur si lavoĉifonon pendantan de la kolo anstataŭ brustotuko, kaj lin sekvis multaj knaboj, pli ĝuste, buboj de la kuirejo kaj friponaj paĝioj; unu portis vazon plenan de likvo kun la koloro kaj la odoro de postlava akvo; li sekvis kaj persekutis la ŝildiston, kaj plej insiste penis metis la vazon sub lian mentonon, dum alia bubo faris kvazaŭ li volus lavi lian barbon.

—Kion signifas ĉi tio, fratoj? —demandis la dukino—. Kion vi faras? Kial vi persekutas ĉi bonulon? Nu, ĉu vi eĉ ne konsideras, ke oni nomis lin gubernatoro?

—Ĉi sinjoro —respondis la fripona bubo-barbiero— oponas al la kutimo kaj ne volas lasi sin lavi, kiel jam faris mia sinjoro la duko kaj lia mastro la kavaliro.

—Jes, mi volas —intervenis Sancho kun kolero—, sed per pli klara akvo, pli puraj tukoj kaj ne tiel nigraj manoj. Ne ekzistas inter mi kaj mia mastro tiom da diferenco, por ke oni lavu lin per akvo de anĝeloj^[314] kaj min per lesivo de diabloj. La kutimoj de landoj kaj nobelaj palacoj bonas dum ili ne kaŭzas ofendon; sed la lavado laŭ la ĉi-tiea modo pli mavas ol la sinskurĝado de la flagelantoj. Mia barbo puras kaj ne bezonas ian lavon; kaj se iu el vi kuraĝos veni lavi min aŭ tuŝi eĉ unu haron de mia kapo, mi volas diri, de mia barbo, tiam, kaj mi parolu kun la ŝuldata respekto, mi donos al li tian baton, ke mia pugno inkrustiĝos en lian kranion. Verdire, ĉi sapadoj kaj cirimonioj^[315] pli ŝajnas moko kontraŭ la gastoj, ol ĝentilaĵoj.

La dukino ridadis ĝiskreve ĉe la kolero kaj la vortoj de Sancho, sed ne tre plaĉis al don Quijote vidi lin misornamita per la makul-jaspita ĉifono kaj ĉirkaŭata de kuirejaj bubaĉoj. Tiel do, profunde riverencinte al la gedukoj, kvazaŭ li petus ilian permeson por paroli, li diris kun multa aplombo al la kuireja plebo:

—Hola, sinjoroj kavaliroj! Viaj moŝtoj lasu trankvila ĉi junulon, reiru al la loko, de kie vi venis, aŭ pelu vin ien ajn, laŭ via plaĉo. Mia ŝildisto puras kiel la plej pura, kaj ĉi etaj vazoj ne pli konvenas al li ol glaso de akvo. Sekvu do mian konsilon kaj lasu lin, ĉar nek li, nek mi, scias toleri mokon.

Sancho kvazaŭ prenis liajn vortojn el lia buŝo, ĉar li interrompis la hidalgon, dirante:

—Ne! Lasu ilin preni min kiel rid-objekton! Ili vidos, ke mi ne toleros tion, tiel sendube, kiel certe nun tagas. Sed ili venu ĉi tien kun kombilo aŭ io ajn alia, striglu al mi la barbon, kaj se ili elŝiros el ĝi ion ofendan al la pureco, ili faru al mia hararo krucoformajn fortondojn!^[316]

Tiam, ankoraŭ ridante, diris la dukino:

—Sancho Panza absolute pravas, kaj pravos senescepte. Li puras, kaj, kiel li mem diras, ne bezonas lavi sin. Kaj se nia kutimo ne plaĉas al li, nu, tio estas lia afero. Krome, vi, zorgantoj de la pureco, montris vin tro senatentaj, kaj mi ne scias, ĉu mi devus diri impertinentaj, pro tio, ke al tiela gravulo kaj al tiela barbo, vi alportis lavo-ĉifonon kaj lignan vazon anstataŭ holandaj mantukoj kaj kruĉoj kaj pelvoj el pura oro. Sed vere, vi estas malicaj kaj de basa nasko, kaj kaŭze de via fripona naturo, vi ne povas ne montri vian envion kaj misvolon kontraŭ la ŝildistoj de la vagantaj kavaliroj.

La petolaj buboj, kaj eĉ la butleroj ilin akompananta, pensis, ke la dukino parolas serioze. Tiel do, ili demetis de la brusto de Sancho la ĉifonon kaj embarasite, preskaŭ hontigite, retiris sin el la ĉambro. La ŝildisto, vidante sin libera de, laŭ sia penso, ekstrema danĝero, genuiĝis antaŭ la dukino kaj diris:

—De grandaj sinjoroj oni devas atendi grandajn favorojn, kaj nun via moŝto faris al mi unu tian, ke mi ne scias, kiel mi povus pagi ĝin, se ne per la deziro kavalirigi min kaj dediĉi mian tutan vivon servi tiel moŝtan sinjorinon. Mi nomiĝas Sancho Panza, estas kampulo, havas edzinon kaj filojn kaj servas ŝildiste. Se per io mi povas servi vin, mi pli rapidos obeante, ol vi ordonante.

—Evidentas, Sancho —respondis la dukino—, ke vi lernis ĝentilon en la lernejo de la ĝentilo mem. Mi volas diri, ke vi nutris vin ĉe la sino de sinjoro don Quijote, kremo de la ĝentilo kaj floro de la ceremonioj, aŭ *cirimonioj*, kiel vi diras. Benon al tia mastro kaj tia servisto! Unu, la poluso de la vaganta kavalirismo; la alia, la stelo de la ŝildista fidelo. Levu vin, amiko Sancho. Mi rekompencos vian ĝentilon,

petante la dukon, mian edzon, ke li plenumu plej rapide sian promeson fari vin gubernatoro.

Ĉe tio la konversacio finiĝis, kaj don Quijote sin retiris siesti. Sed la dukino petis la ŝildiston iri, se li ne havus dormemon, pasigi la vesperon kun ŝi kaj ŝiaj damoj en tre friska salono. Sancho respondis, ke, kvankam li kutimas siesti en la somero kvar aŭ kvin horojn posttagmeze, li farus sian plejeblon, por komplezi al ŝia ekscelenca moŝto, tute ne dormi en la tago kaj obei ŝian ordonon.

La duko donis novajn instrukciojn, pri kiel oni traktu la hidalgon kiel vagantan kavaliron sen devii eĉ unu colon de la reguloj laŭdire iam observataj koncerne al la vagantaj kavaliroj.

[313] Alia sarkasmo de Cervantes. En El Toboso ekzistis neniam familioj nobelaj aŭ hidalgaj.

[314] Oni donis ĉi nomon al parfumita akvo.

[315] Misprononcita «ceremonioj».

[316] Kiajn oni faris al konviktitoj pri difinitaj specoj de deliktoj.

Ĉapitro 33

Pri la plaĉa, leginda kaj notinda konversacio inter la dukino, ties damoj kaj Sancho Panza

Rakontas do la historio, ke, manĝinte, Sancho tenis sian parolon kaj, anstataŭ siesti, iris viziti la dukinon. Ŝi, en sia deziro aŭskulti lin, igis lin sidiĝi sur tabureto apud ŝi, kvankam Sancho montriĝis tiel bone edukita, ke en la unua momento li rifuzis okupi la sidilon. Sed la dukino insistis, ke li sidiĝu kiel gubernatoro kaj parolu kiel ŝildisto, ĉar en ĉi duobla funkcio li meritis la fotelon mem de Cid Rui Díaz Campeador.

Sancho levetis la ŝultrojn, obee sidiĝis, kaj la damoj kaj duenoj de la dukino, pretaj aŭskulti kun granda atento, silente lin ĉirkaŭis. La dukino parolis la unua, dirante:

—Nun, kiam ni estas solaj, kaj oni ne aŭskultas nin, mi dezirus, ke la sinjoro gubernatoro solvus al mi certajn dubojn, kiuj fontas de la historio, jam presita, de la granda don Quijote. Unu el ĉi duboj estas, ke, se konsideri, ke la bona Sancho neniam renkontis Dulcinean, pli ĝuste, sinjorinon Dulcinea de El Toboso, nek li alportis al ŝi la leteron de sinjoro don Quijote, ĉar ĝi restis en la not-kajero, en Sierra Morena, kiel do vi kuraĝis fikcii la respondon kaj krome aserti, moke kaj mensoge, ke vi trovis ŝin kribranta tritikon, kio damaĝas la reputacion de la nekomparebla Dulcinea kaj ne indas je la honesto kaj fidelo de ŝildisto?

Ĉe ĉi vortoj Sancho stariĝis kaj, sen respondi ion, kun la kapo klinita, lantaj paŝoj kaj unu fingro sur la lipoj, rondiris la salonon levante la surmurajn tapiŝojn. Poste li denove sidiĝis kaj diris:

—Nun, sinjorino, kiam mi certas, ke oni ne aŭskultas min kaŝite, kaj ke nur ĉi damoj troviĝas ĉi tie, mi respondos sen timo kaj alarmo kion oni demandis kaj demandos al mi. Unue, mi volas diri, ke mi konsideras mian sinjoron don Quijote absolute freneza, kvankam, laŭ mia opinio, kaj la opinio de liaj ceteraj aŭskultantoj, de tempo al tempo li esprimas sin per rezonoj konformaj al la saĝo, tiel, ke Satano mem ne povus superi lin. Tamen, mi havas la plenan kaj firman konvinkon, ke li frenezas. Tiel do, kun ĉi konvinko fiksita en mia kapo, mi ne hezitas igi lin kredi aferojn sen senco kaj esenco, por ekzemplo, la respondon al lia letero, aŭ tion okazintan antaŭ ses aŭ ok tagoj, nome la ensorĉon de mia sinjorino doña Dulcinea, aferon ankoraŭ ne rakontitan en la historio. Mi igis lin kredi, ke ŝi estas ensorĉita, kio distancas mil mejlojn de la vero.

La dukino petis lin rakonti pri ĉi ensorĉo aŭ mistifiko, kaj Sancho pentris la epizodon, ĝuste kiel ĝi okazis, ĉe la granda plezuro de la aŭskultantinoj. Poste, la dukino plu rimarkis:

—Io en la rakonto de la bona Sancho movas la perplekson en mia animo; kaj certa flustro atingas mian orelon kaj diras: «Nu, se don Quijote de La Mancha estas freneza kaj ekstravaganca, kaj lia ŝildisto Sancho Panza lin konas kaj tamen lin sekvas kaj fidas al liaj vanaj promesoj, sendube li eĉ pli frenezas kaj stultas ol lia mastro. Kaj se tiel, kaj efektive tiel estas, oni kritikos vin, sinjorino dukino, se vi donos insulon al Sancho Panza, ke li ĝin regu, ĉar la persono ne scianta regi sin, kiel povus regi aliajn?». ».

—Je Dio, sinjorino —respondis Sancho—, via perplekso estas komprenebla. Kaj la flustro de via moŝto parolu pli laŭte, aŭ laŭ sia plaĉo, ĉar mi konfesas, ke ĝi diras la veron: se mi prudentus, jam de longe mi estus forlasinta mian mastron. Sed jen mia fato kaj mia misfortuno: mi devas sekvi lin; ni

apartenas al la sama vilaĝo; mi manĝas lian panon kaj tre amas lin; li montras sin dankema, donis al mi siajn azenidojn; kaj, ĉefe, mi fidelas. Tiel do, nenio povas apartigi nin unu de la alia, se ne la pioĉo kaj la ŝovelilo.^[317] Kaj se via moŝto ne volus doni al mi la promesitan gubernatorecon, Dio kreis min nuda kaj, se mi ne ricevos la insulon, tio eble havos favoran rezulton por la bono de mia konscienco, ĉar, kvankam mi stultas, mi komprenas la proverbon «La formiko ricevas flugilojn por sia misfortuno»^[318] kaj eble Sancho la ŝildisto irus al la paradizo pli rapide ol Sancho la gubernatoro. Tiel bonan panon oni faras ĉi tie, kiel en Francujo, kaj kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas. Kaj sufiĉan misfortunon havas la homo, kiu, ĉe la dua posttagmeze, ne matenmanĝis ankoraŭ; kaj ne ekzistas stomako unu spanon pli granda ol alia, kaj cetere oni povas ĝin plenigi per fojno kaj pajlo: kaj Dio nutras kaj provizas la birdetojn de la kamparo; kaj kvar ulnoj da drapo de Cuenca varmigas pli ol kvar da sak-tolo de Segovia; kiam ni forlasas ĉi mondon kaj oni nin metas en la teron, la pado de princo tiel stretas kiel la pado de laboristo, kaj la korpo de papo ne okupas pli da loko ol la korpo de sakristiano, eĉ se unu pli altas ol la alia; sobirante en la tombon, ni ĉiuj kunpremiĝas kaj adaptiĝas al ĝi, aŭ, alie, oni nin kunpremas kaj adaptas, vole nevole... kaj bonan nokton! Kaj mi ripetas, ke se via moŝto ne volas doni al mi la insulon, ĉar mi stultas, mi estos sufiĉe saĝa ne tro zorgi pri via decido. Mi jam aŭdis, ke post la kruco sin kaŝas la diablo, ke ne ĉio estas oro, kio brilas, kaj ke el inter bovoj, plugiloj kaj jugoj oni prenis la kampulon Wamba por fari lin reĝo de Hispanujo; ^[319] kaj el inter brokatoj, regaloj kaj riĉoj oni trenis Rodrigon, por ke la kolubroj lin manĝu, se la versoj de la antikvaj romanoj ne mensogas.

—Ili tute ne mensogas —diris tiam la duenjo doña Rodríguez, tie aŭskultanta— Unu romano rakontas, ke oni

metis la reĝon Rodrigo viva en tombon plenan de bufoj, kolubroj kaj lacertoj, kaj ke, du tagojn poste, de la interno de la tombo diris la reĝo kun voĉo softa kaj vea:

Ili manĝas al mi ronĝe
mian parton pli pekeman,

»kaj tial, ĉi sinjoro tre pravas, dirante, ke li preferas esti kampulo, anstataŭ reĝo manĝota de aĉaj reptilioj.

La dukino ne povis retenigi la ridon ĉe la simpleco de sia duenjo, nek eviti miri je la rezonoj kaj proverboj de Sancho, kaj diris al li:

—La bona Sancho scias ke, se kavaliro faras promeson, li klopodas ĝin plenumi, eĉ je la kosto de sia vivo. Mia sinjoro kaj edzo, la duko, kvankam ne vaganta, estas kavaliro, do li tenos sian parolon pri la promesita insulo, malgraŭ la envio kaj la malico de la mondo. Ne perdu la esperon, Sancho, ĉar en la plej neatendita momento, vi vidos vin sur la trono de via insulo, kaj vi ĝin ŝanĝus nur por alia tiel riĉa kiel dika brokato. Mi speciale rekomendos al vi, ke vi zorgu, kiel vi regos super viaj subuloj, ĉar senescepte ili estas honestaj kaj lojalaj.

—Oni ne bezonas rekomendi al mi bone regadi —respondis Sancho—, ĉar mi havas bonkoran naturon kaj sentas kompaton al la paŭperaj; kaj oni ne ŝtelu la panon, disde kiu knedas kaj kuiras la paston; kaj, je la sankta kruco, oni ne trompos min per falsaj ĵet-kuboj: mi havas la sperton de olda hundo, komprenas ĉies intencon, scias lerti siatempe, ne toleras, ke oni ĵetu al mi sablon en la okulojn, kaj scias, ke la ŝuo min doloras. Mi volas diri, ke la homoj virtaj havos ĉe mi bonan akcepton kaj konsideron, kaj la malicaj nek bonvenon nek eniron. Ŝajnas al mi ke, rilate al la regado, plej gravas komenci, kaj povus okazi, ke dek kvin tagojn post mia

enposteniĝo, mi gubernatorus tiel glite kiel ansero glitas sur rivero, kaj sciis pri la ofico pli ol pri la kapolaboroj, kie mi edukiĝis.

—Vi pravas, Sancho —diris la dukino—. Neniu naskiĝas klera, kaj el viroj, ne el ŝtonoj, fariĝas episkopoj. Sed ni revenu al nia ĵusa konversacio pri la ensorĉo de sinjorino Dulcinea. Temas pri certa kaj pli ol pruvita afero, ke unu el la sorĉistoj, kiuj persekutas sinjoron don Quijote, inspiris al Sancho la ideon mistifiki sian mastron kaj igi lin kredi, ke la kampulino estas Dulcinea, kaj ke la hidalgo ne rekonis ŝin, ĉar oni ŝin ensorĉis. Mi scias el tre fidindaj fontoj, ke fakte kaj vere, la kampulino saltinta sur la azenon estas Dulcinea de El Toboso, kaj ke la bona Sancho, kredante trompi sian mastron, trompis sin mem. Tio ne pli dubindas ol aliaj aferoj neniam vidataj. Kaj sinjoro Sancho Panza sciu, ke ankaŭ ĉi tie troviĝas bonvolaj sorĉistoj, kiuj pure kaj simple, sen komplikoj kaj artifiko, diras al ni, kio okazas en la mondo. Kaj kreu min, Sancho, la kapriolema kampulino estis, kaj estas, Dulcinea de El Toboso, kaj ŝi suferas tiel grandan ensorĉon kiel la virino ŝin akuŝinta. Kaj en la plej neatendita momento ni certe vidos ŝin en ties propra figuro, kaj tiam Sancho komprenos, en kia eraro li vivas.

—Eble vi pravas —respondis Sancho—, kaj nun mi inklinus kredi kion mia mastro rakontis pri la kaverno de Montesinos, kie, laŭ siaj vortoj, li vidis sinjorinon Dulcinea de El Toboso en la sama kostumo, kiun mi atribuis al ŝi, kiam mi ensorĉis ŝin por mia propra amuzo; sed, kiel via moŝto asertas, sendube ĉio okazis inverse, ĉar oni nek povas nek devas supozi, ke mia povra inĝenio kapablas inventi en unu momento tiel ruzan artifikon; aliflanke, mi ne opinias mian mastron tiel freneza, ke mia febla kaj magra persvado puŝus lin kredi vera ion tiel fremdan al la sana prudento. Bonvolu do, sinjorino, ne rigardi min misintenca, ĉar oni ne povas peti de stulta homo kiel mi, penetri en la menson kaj en la

malican planadon de perversaj sorĉistoj. Mi inventis la ensorĉon de sinjorino Dulcinea, ne kun la intenco ofendi mian mastron, sed kiel rimedon eviti al mi lian skoldadon: kaj se la aferoj okazis inverse, Dio ekzistas en la ĉielo kaj li legas en niaj koroj.

—Vi pravas —diris la dukino—. Sed vi menciis ion pri la kaverno de Montesinos. Tre plaĉus al mi, se vi bonvolus rakonti ĉi aferon.

Tiam Sancho Panza rakontis, de la komenco ĝis la fino, ĉion jam skribitan pri ĉi aventuro. Aŭskultinte lin, la dukino diris:

—Se la granda don Quijote asertas, ke li vidis en la kaverno la saman kampulinon, kiun Sancho renkontis proksime al El Toboso, ni devas konkludi, ke ŝi estis Dulcinea, kaj ke abundas la sorĉistoj ruzaj kaj aktivaj.

—Mi opinias la samon —respondis Sancho— sed, se mia sinjorino Dulcinea de El Toboso estas ensorĉita, des pli mave por ŝi. De mia flanko, mi havas nenian devon alfronti al la malamikoj de mia mastro, sendube multaj kaj perversaj. Verdire, mi vidis kampulinon, prenis ŝin por kampulino; kaj, se ŝi estis Dulcinea, tio nek tuŝas nek koncernas min, kaj punkto. Oni ne riproĉu al mi ĉiumomente per la refreno: «Sancho diris tion, Sancho faris alion, Sancho iris, Sancho revenis», kvazaŭ Sancho estus ajna ulo, kaj ne Sancho Panza mem, la sama iranta en la libroj tra la tuta mondo, kiel diris al mi Sansón Carrasco, almenaŭ bakalaŭro licenciita en Salamanca; kaj la homoj kiel li ne mensogas, escepte se ili volas, aŭ se al ili konvenas mensogi. Tiel do, oni ne admonu min, kaj, se konsideri, ke mi havas bonan reputacion kaj ke, kiel mi aŭdis diri al mia mastro, «pli valoras bona famo ol multe da riĉo», bonvolu akomodi al mi la insulon, kaj la homoj vidos mirindaĵojn, ĉar, kiu bonas ŝildiste, bonos ankaŭ gubernatore.

—Kion diris ĝis nun la bona Sancho —komentis la dukino—, tio apartenas al la esenco mem de Micael Verini, *florentibus occidit annis*.^[320] Nu, se paroli laŭ la stilo de Sancho, «sub mava mantelo ofte troviĝas bona drinkanto».

—Verdire, sinjorino —respondis la ŝildisto—, mi neniam drinkas pro diboĉa inklino. Sed, mi diru sen hipokrito, vinon mi trinkas, kiam mi soifas, aŭ, eĉ se mi ne soifas, kiam oni invitas min, ĉar ne plaĉas al mi ŝajni afekta aŭ misedukita. Ĉu eble ekzistas koro sufiĉe marmora por ne reciproki la toston de amiko? Kvankam mi portas kuloton, mi ne makulas ĝin, des malpli, se konsideri, ke la vagantaj kavaliroj preskaŭ ĉiam trinkas akvon en siaj konstantaj vagadoj tra arbaroj, herbejoj, montoj kaj valoj, kaj trovas eĉ ne iometon da vino, eĉ se ili pretus doni por ĝi unu okulon.

—Mi kredas vin, Sancho —diris la dukino—, kaj nun, iru ripozi. Poste ni havos okazon pli longe paroli, kaj mi ordonos, ke oni baldaŭ akomodu al vi, kiel vi diras, la insulon.

Sancho kisis denove la manon de la dukino kaj suplikis ŝin ordoni, ke oni bone zorgu lian grizulon, ĉar li amas ĝin kiel la lumon de siaj okuloj.

—Pri kiu grizulo vi parolas? —demandis la dukino.

—Pri mia azeno —respondis Sancho—. Mi nomas ĝin grizulo, por ne diri azeno. Kiam mi eniris en ĉi kastelon, mi suplikis ĉi moŝtan duenjon, ke ŝi zorgu pri ĝi, sed ŝi furioziĝis, kvazaŭ mi estus nominta ŝin turpa kaj olda. Ĉu ne ŝajnas pli dece kaj nature, ke la duenjoj zorgu pri azenoj, anstataŭ ordoni en la salonoj? Je Dio, kiel granda antipatio sentis kontraŭ la duenjoj unu hidalgo de mia vilaĝo!

—Certe li estis kampulaĉo —diris la duenjo doña Rodríguez—, ĉar, se hidalgo kaj de moŝta nasko, li levus ilin per siaj

laŭdoj ĝis super la kornoj de la luno.

—Nu, bone, sufiĉe! —ordonis la dukino—. Silentu doña Rodríguez, kaj trankviliĝu sinjoro Panza. Mi prenos sur min regali la grizulon, kaj tial, ke ĝi estas juvelo de Sancho, mi tenos ĝin en la pupiloj de miaj okuloj.

—Sufiĉas, ke oni ĝin tenu en la stalo —respondis Sancho—, ĉar nek ĝi nek mi indas stari en la okuloj de Via Grandeco eĉ unu solan momenton: tiom mi volus tian aferon, kiom ponardi min mem. Kvankam diras mia mastro, ke en la kampo de la ĝentilo oni prefere peku per tro da komplimentoj ol per nesufiĉo, en afero de azenoj oni devas kondukti takte kaj mezure.

—Konduku la grizulon al via gubernatora posteno, kaj tie vi povos regali ĝin laŭvole kaj eĉ liberigi ĝin de ties laboroj —diris la dukino.

—Ne pensu, sinjorino dukino, ke vi diras ion notindan —respondis Sancho—. Mi jam vidis nombron da azenoj en tiaj postenoj, do estus nenio nova, se mi prenos la grizulon al mia gubernatora funkcio.

La vortoj de Sancho denove provokis la ridon kaj amuzon de la dukino. Sendinte lin ripozi, ŝi iris informi la dukon pri sia konversacio kun la ŝildisto. Tiam, ambaŭ planis kaj aranĝis kontraŭ don Quijote grandiozan ŝercon laŭan al la kavalira stilo. Kaj vere ili inventis tiom da ŝercoj spritaj kaj oportunaj, ke ili estas la plej bonaj epizodoj de ĉi longa historio.

[317] Konsiderataj kiel iloj uzataj por la fosado de tomboj; eŭfemismo anstataŭ «la morto».

[318] Ĉar tiam la birdoj ĝin manĝas. En figura senco, averto kontraŭ la ambicio.

[319] Wamba, aŭ Vambo, visigota reĝo (672-680).

[320] Micael Verini estis juna poeto itala, mortinta en la aĝo de dek sep jaroj, en 1483. La latinaĵo, parto de unu verso de lia sam-epoka poeto Angelo Poliziano, signifas: «mortinta en la floro de sia vivo».

Ĉapitro 34

Pri la sciigo ricevita rilate al la maniero elsorĉi la senegalan Dulcinea de El Toboso, kio estas unu el la plej famaj epizodoj de ĉi libro

La konversacioj de don Quijote kaj Sancho Panza tre plaĉis al la duko kaj la dukino; kaj, decidinte fari al ili ŝercon kun ŝajno kaj formo de aventuro, la gedukoj inspiriĝis en la epizodo de la kaverno de Montesinos —epizodo jam rakontita al ili ankaŭ de don Quijote— por prepari kaj aranĝi grandiozan mistifikon. De sia flanko, la dukino plej miris je la granda naivo de Sancho, ĉar la ŝildisto fine kredis nerefutebla vero la ensorĉon de Dulcinea, kvankam en ĉi afero li estis la sorĉanto kaj la mensogulo.

Tiel do, instrukciinte al siaj servistoj kion ili devos fari en la ĝusta momento, la gedukoj, ses tagojn poste, iris ĉasi kun la hidalgo kaj kun tiom da ĉasantoj kaj pelantoj, ke la grupo ŝajnis aparteni al la reĝo. Pli frue oni proponis al don Quijote ĉas-kostumon, kaj al la ŝildisto alian el verda drapo tre bonkvalita; sed la hidalgo rifuzis la sian, dirante, ke tial, ke li devas plu aktivi en la rigora profesio de vaganta kavaliro, li ne povus porti kun si vestoŝrankon aŭ provizejon. De sia flanko, Sancho prenis la veston, kun la intenco vendi ĝin en la unua oportuna momento.

Alvenis do la difinita tago, don Quijote armis sin, Sancho surmetis sian novan veston, kaj, rajde sur la azeno, de kiu li ne volis disigi sin, kvankam oni proponis al li ĉevalon, metis sin en la grupon de ĉasantoj. La dukino eliris en superba kostumo, kaj don Quijote, kiel perfekta mondumulo bonmaniera, prenis la bridon de ŝia palefreno, kvankam la

duko ne volis tion konsenti. Kelkan tempon poste, ili alvenis al arbaro situanta inter du altegaj montoj, ĉiu okupis sian embuskejon, kaj komenciĝis la ĉaso meze de granda tumulto de krioj kaj voĉoj, tiom, ke la homoj ne aŭdis unu la alian pro la bojado de la hundoj kaj la sono de la kornoj.

La dukino deseliĝis kaj, kun pinta ĵetlanko en la mano, enposteniĝis en loko, kie, ŝi sciis, ordinare pasis aproj. Ankaŭ la duko kaj don Quijote deseliĝis kaj lokis sin ĉe ŝiaj flankoj. Sancho restis post ili, sen descendi de la azeno, kiun li ne kuraĝis forlasi, pro timo ke ia akcidento povus trafi ĝin. Sed apenaŭ ili metis la piedon sur la teron kaj lokis sin en linio kun granda nombro da servistoj, ili vidis, ke impona apro, alpelata de la hundoj kaj persekutata de la ĉasantoj, impetas kontraŭ ili, grincante per la dentoj kaj tuskoj^[321] kaj ĵetante ŝaŭmon el sia buŝo. don Quijote, ĝin vidante, fiksas la ŝildon al sia brako kaj, kun la glavo en la mano, alpaŝis por ĝin ricevi. La duko faris la samon kun sia ĵetlanko, sed la dukino estus antaŭiĝinta al ĉiuj, se ŝia edzo ne retenus ŝin. Nur Sancho ne imitis ilin; kontraŭe, ekvidante la kuraĝan beston, li forlasis la azenon, komencis kuri plej rapide kaj penis grimpi al la supro de alta kverko, sed ne sukcesis, ĉar, atinginte la mezon de la arbokrono, li kroĉiĝis al branĉo, kaj tia misŝanco lin trafis, ke pro lia baraktado supri ĝis la pinto, la branĉo rompiĝis; li komencis fali al la grundo, subite kverka stumpo detenis lin, kaj Sancho restis en la aero, pendante de la stumpo kaj sen povi atingi la teron. Vidante sin en tia situacio, sentante, ke la verda saĵo ŝiriĝas, kaj pensante, ke la sovaĝa apro povus trafiri lin, se ĝi kurus ĝis la kverko, Sancho komencis tiom kriadi kaj peti helpon, ke la homoj, kiuj aŭdis sed ne vidis, imagis, ke ili baraktas inter la dentoj de fera besto. Fine, la grandatuska apro falis sub la piko de multaj ĵetlancoj ĝin ricevintaj, kaj don Quijote, turnante la kapon ĉe la krioj de Sancho, vidis lin kun la kapo malsupre, kaj la azenon ĉe lia flanko, ĉar la grizulo ne forlasis lin en ties misfortuno. Ĉi-rilate Cide Hamete diras,

ke li preskaŭ neniam vidis la azenon sen vidi Sanchon aŭ Sanchon sen vidi la azenon: tian amikecon kaj fidelon sentis unu por la alia.

Don Quijote aliris, dekroĉis la ŝildiston, kaj ĉi lasta, vidante sin libera kaj sur la tero, rigardis la ŝiron de sia ĉaso-sajo kaj sentis profundan aflikton en la koro, ĉar li pensis, ke kun tia vesto li posedas eksterordinaran valoraĵon. Dume oni ĵetis sur mulon la fortan korpon de la apro, kovris ĝin per tufoj de rosmareno kaj branĉoj de mirto, kaj triumfe transportis la predon al vastaj tendoj starantaj meze de la arbaro. Tie troviĝis jam primetitaj tabloj, provizitaj per tiel superba kaj abunda manĝo, ke oni tuj vidis la rangon kaj la riĉon de la invitanto. Sancho montris al la dukino la fendojn de sia ŝirita vesto kaj diris:

—Se ni estus ĉasintaj leporojn aŭ birdojn, mia sajo certe ne suferus ĉi damaĝon. Mi ne komprenas, ke oni povas ricevi ian plezuron embuskante beston, kapablan mortigi personon, se ĝi trafas lin per siaj tuskoj. Mi memoras, ke iam mi aŭdis kanti oldan romancon kun ĉi versoj:

Ursoj al vi donu morton
kiel al Favilo fama.

—Favilo estis gota reĝo. Foje kiam li ĉasis, urso surprizis kaj manĝis lin —klarigis don Quijote.

—Tion mi volas diri —respondis Sancho—: Ke mi ne komprenas, ke reĝoj kaj princoj elmetas sin al tiaj danĝeroj nur pro plezuro... kvankam, kian plezuron oni povas ricevi, mortigante bestojn kulpajn je nenia krimo?

—Vi tre eraras, Sancho —respondis la duko—, ĉar la ĉaso, pli ol alia ajn ekzercado, konvenas al reĝoj kaj princoj. La ĉaso iel similas al milito: en ĝi taŭgas artifikaĵoj, ruzoj kaj embuskoj por sekure venki la malamikon; en ĝi oni suferas

ĝisekstreme tro da varmo kaj tro da frido; en ĝi oni lernas ignori la pigron kaj la dormemon; en ĝi kreskas la forto de la korpo kaj la flekseblo de la membroj; kaj fine, ĉi ekzercado kaŭzas damaĝon al neniu kaj plezuron al multaj. La plej granda avantaĝo de la ĉaso maĵora^[322] estas, ke ĉiuj personoj ne povas ĝin praktiki, eĉ se ili povas dediĉi sin al aliaj specoj de ĉaso, se escepti la ĉason per falkoj, same rezervitan al reĝoj kaj grandaj sinjoroj. Tiel do, Sancho, ŝanĝu vian opinion kaj, kiam vi estos gubernatoro, ankaŭ vi ĉasu, kaj vi vidos, ke tia ekzercado tre utilos al vi.

—Ho, ne! —respondis Sancho—. Al bona gubernatoro, same kiel al rompita kruro, plej konvenas resti hejme. Estus bele, se oni venus, post laciga vojaĝo, renkonti lin por trakti ian aferon, kaj li troviĝus for, amuzante sin en la montoj! Tiamaniere la regado irus baldaŭ al la diablo. Vere, sinjoro, ĉaso kaj amuzoj pli apartenas al neniofarantoj ol al gubernatoroj. Mi pensas distri min nur per ludkartoj en la tagoj de Pasko, kaj per kegloj en la dimanĉoj kaj ceteraj festoj; la ĉasoj, ielaj aŭ tielaj, ne akordiĝas kun mia naturo nek kun mia konscienco.

—Dio volu, Sancho, ke vi tenu vian parolon —diris la duko—, ĉar «inter diro kaj faro estas maro».

—Tamen —respondis Sancho— «bona paganto facile donas garantion» kaj «homo kun la helpo de Dio pli prosperas ol frua ellitiĝanto» kaj «ventro movas krurojn, ne kruroj ventron». Mi volas diri, ke, se Dio min helpos, kaj mi faros mian devon kun sana intenco, sendube mi regos kun takto kaj energio. Oni metu al mi fingron en la buŝon kaj baldaŭ vidos, ĉu mi mordas aŭ ne.

—Dio kaj la sanktuloj vin damnu, Sancho de la demono! —kriis don Quijote—. Mi jam ofte diris al vi la samon: ĉu iam mi vidos vin paroli frazon koheran ĝis la fino, sen intermeto

de proverboj? Viaj Grandecoj ne turnu la atenton al ĉi stultulo, ĉar li muelos al vi la animon, ne nur inter du, sed inter du mil proverboj, tiel konformaj kaj laŭaj al la objekto de la konversacio, ke... nu, li ne ĉesos proverbumi, dum Dio donos al li sanon, kaj al mi paciencon por auŝkulti lin.

—La proverboj de Sancho Panza —diris la dukino—, kvankam pli multaj ol la proverboj de la Greka Komandoro, [323] valoras ne malpli ol ĉi lastaj, pro la lakono de siaj esprimoj. De mia flanko, mi konfesas, ke la proverboj de Sancho donas al mi pli da plezuro ol aliaj eĉ pli kongruaj kaj laŭcelaj.

Kun ĉi agrabla konversacio kaj kelkaj similaj babiladoj, ili eliris el la tendo en la arbaron kaj pasis la ceteron de la tago vizitante la postenojn kaj la embuskojn. Alvenis la nokto, ne tiel klara kaj kalma, kiel oni atendus en la tiama sezono, t.e. en la mezo de la somero, sed ia perceptebla duonlumo tre helpis la projekton de la gedukoj. Iom post la krepusko, kaj kiam la nokto komencis fali, subite ŝajnis kvazaŭ la tuta arbaro brulus; tuj poste aŭdiĝis ie, tie kaj ĉie nekalkulebla nombro da trumpetoj kaj aliaj militaj instrumentoj, kvazaŭ multaj kavalariaj trupoj pasus tra la arbaro. La brilo de la fajroj kaj la bruo de la muzikiloj preskaŭ blindigis kaj surdigis la okulojn kaj la orelojn de la ĉasantoj kaj de la ceteraj personoj en la arbaro. Poste eĥis ĉie laŭtaj lelilioj, [324] la bataalkrio de la maŭroj, resonis trumpetoj kaj klarionoj, tondris tamburoj, fajfis fifroj, ĉio preskaŭ en la sama tempo, tiel rapide kaj senĉese, ke, antaŭ la tumulto de tiom da instrumentoj, necesus esti sensensa por ne perdi la sensojn. Miris la duko, stuporis la dukino, surpriziĝis don Quijote, tremis Sancho Panza; fine, eĉ la konantoj de la farso sentis alarmon. La timo tenis ilin en silento, kaj tiam, unu kuriero en kostumo de diablo proksimiĝis al ili, blovante, ne per korneto, sed per ega korno kava, kiu elĵetis el si raŭkan kaj teruran sonon.

—Hola, frato kuriero! —kriis la duko—. Kiu vi estas? Kien vi iras? Kiu estas la soldatoj, ŝajne irantaj tra ĉi arbaro?

Al tio la kuriero respondis kun voĉo laŭta kaj horora:

—Mi estas la diablo kaj serĉas don Quijote de La Mancha. Kaj al ĉi loko proksimiĝas ses armeoj de sorĉistoj kun triumfa ĉaro, kie ili transportas la senegalan Dulcinea de El Toboso. Ensorĉita, ŝi venas kun la brava franco Montesinos, kiu donos instrukcion al don Quijote pri la maniero elsorĉi la menciitan sinjorinon.

—Se vi estus la diablo, kiel vi asertas, kaj kiel via figuro montras, vi estus jam rekoninta la kavaliron don Quijote de La Mancha, ĉar li staras antaŭ vi.

—Je Dio kaj mia animo! —respondis la diablo—. Mi ne tre atentis. Mi havas tiom da aferoj en la kapo, ke mi preskaŭ forgesis la ĉefan motivon de mia vizito.

—Ĉi diablo sendube estas honesta homo kaj bona kristano —diris Sancho—. Alie li ne ĵurus je Dio kaj je sia animo. Nun mi vidas, ke eĉ en la propra infero ekzistas bonuloj.

La diablo, sen deseliĝi, turnis sian rigardon al don Quijote kaj diris:

—Al vi, Kavaliro de la Leonoj (mi vidu vin inter iliaj krifoj!) min sendas la senfortuna sed kuraĝa kavaliro Montesinos. Li min ordonis, ke mi diru al vi, de lia flanko, ke vi atendu lin en la sama loko, kie mi renkontas vin, ĉar li portas kun si sinjorinon Dulcinea de El Toboso kaj komunikos al vi ĉion necesan por ŝia elsorĉo. Kaj tial, ke mi venas por nenio alia, mi ne plu prokrastos mian foriron. La diabloj kiel mi restu kun vi, kaj la bonaj anĝeloj kun ĉi nobela paro.

Tion dirinte, li blovis per sia enorma korno, turnis la dorson kaj forrajdis sen atendi respondon. Kreskis ĉies admiro, sed plej forte stuporis Sancho kaj don Quijote; Sancho, ĉar li vidis, ke, spite al la vero, oni insistas pri la ensorĉo de Dulcinea; don Quijote, ĉar li ne tre certis, ĉu veris aŭ ne liaj travivaĵoj en la kaverno de Montesinos. Absorbite en tiaj pensoj, li aŭdis la dukon diri:

—Ĉu via moŝto intencas atendi, sinjoro don Quijote?

—Jes, kompreneble! —respondis la hidalgo—. Ĉi tie mi atendos, senhezite kaj firme, eĉ se la tuta infero venus min ataki.

—Sed se mi vidos alian diablon kaj aŭdos kornon kiel la lastan, mi atendos ĉi tie tiel longe, kiel mi atendus en Flandrujo^[325] —diris Sancho.

Jam la nokto pli nigris, kaj multaj lumoj komencis rapidi inter la arboj, en maniero simila al la sekaj haladzoj, kiuj leviĝas de la tero kaj, jam en la ĉielo, ŝajnas al nia vido flugantaj steloj. Krome aŭdiĝis terura bruo ŝajne venanta de masivaj radoj de bovoĉaroj, de kies aspra grincado forkuras, laŭdire, la ursoj kaj la lupoj, se ili proksimas. Tamen, al ĉi senbrida tumulto aldoniĝis alia eĉ pli intensa, kvazaŭ kvar apartaj eskirmoj aŭ bataloj disvolviĝus samtempe sur la kvar partoj de la arbaro: ie klakis surdiga tondro de kanonoj; tie eksplodis la pafoj de nenombreblaj arkebuzoj; pretere resonis la krioj de la batalantoj; fore ripetiĝis la maŭraj lelilioj. Kaj la kornetoj, kornoj, klarionoj, trumpetoj, bukcenoj, tamburoj, kanonoj, arkebuzoj kaj ĉefe la harstariga grincado de la ĉaroj faris tiel konfuzan kaj hororan bruegon, ke don Quijote bezonis helpi al si per sia tuta kuraĝo por elteni en tia pandemonio; sed la kuraĝo de Sancho ŝanceliĝis, kaj li svenis kaj falis sur la jupon de la dukino, kie li restis, dum ŝi tuj ordonis, ke oni ĵetu al li akvon sur la vizaĝon. Oni tion

faris, kaj la ŝildisto retrovis la konscion, ĝuste kiam unu el la ĉaroj kun grincaj radoj proksimiĝis al la loko, kie la grupo atendis. La ĉaron tiris kvar lantapaŝaj bovoj kovritaj per nigraj drapoj, kaj kun unu granda torĉo el vakso alligita al ĉiu korno. Supre de la ĉaro staris alta seĝo, kie sidis respektinda oldulo kun barbo longa ĝis sub la talio kaj pli blanka ol la neĝo. Li portis longan robon el nigra fusteno, kaj tial, ke la ĉaro plenis de lampionoj, oni facile vidis kaj distingis ĉion en ĝia interno. La veturilon gvidis du turpaj demonoj vestitaj same per fusteno, kun tiel hidaj vizaĝoj, ke Sancho, vidinte ilin la unuan fojon, fermis la okulojn por ne vidi ilin denove.

La ĉaro fine haltis antaŭ la grupo, la respektinda oldulo stariĝis de sia alta seĝo kaj, jam surpiede, kriis:

—Mi estas la saĝulo Lirgandeo!

La ĉaro denove ekiris, sen ke oni pli parolus, sed tuj aperis alia ĉaro simila al la unua, kun alia oldulo sidanta sur trono; li ordonis deteni la veturilon kaj, kun voĉo ne malpli forta ol la antaŭa, diris:

—Mi estas la saĝulo Alquife, granda amiko de Urganda la nekonata!

Kaj ili pasis pretere. Poste, en la sama maniero proksimiĝis alia ĉaro, sed sur la trono sidis, ne oldulo, sed fortika viro, alta kaj kun malica mieno. Kiam la veturilo haltis antaŭ la grupo, li stariĝis, same kiel la aliaj faris pli frue, kaj diris kun voĉo eĉ pli raŭka kaj infera:

—Mi estas la sorĉisto Arcalaus, ĝismorta malamiko de Amadís de Gaŭlio kaj de ties tuta familio!

Kaj li forveturis. Je kelkaj distanco de tie, la tri ĉaroj haltis, la agaca grincado de ties radoj ĉesis, kaj poste aŭdiĝis, ne alia

bruo, sed milda kaj harmonio muziko, ĉe kies melodio Sancho ĝojis. Li konsideris ĝin bona aŭguro kaj diris al la dukino de kies flanko li ne apartiĝis eĉ unu colon:

—Sinjorino, kie muziko sonas, ne povas ekzisti io mava.

—Ankaŭ ne, kie ekzistas klaro kaj lumoj —respondis la dukino.

—La flamoj donas lumon, kaj la fajroj brilon, kiel ni vidas nun, sed ili povus ankaŭ rosti nin. Sed la muziko ĉiam estas signo de ĝojo kaj festoj.

—Ni vidos —komentis don Quijote, kiu aŭskultis la dialogon.

Kaj trafe li komentis, kiel montras la sekvanta ĉapitro.

[321] Neologismo. Hispane «colmillo»; france «défense»; angle «tusk». Longa dento elstaranta el la buŝo de certaj bestoj. Anstataŭ la pli vastasenca kaj ĝenerala «dentego».

[322] «Ĉaso maĵora»: kontraŭ bestoj maĵoraj, kiel ursoj, aproj, cervoj, ktp; «ĉaso minora»: kontraŭ bestoj minoraj, kiel leporoj, kunikloj, ktp.

[323] Alnomo de Hernán Núñez de Guzmán. En 1555 li eldonis kompilaĵon konsistantan el tri mil proverboj.

[324] Hispane «lelilíes» aŭ «lililíes».

[325] Ironio de Sancho. Flandrujo, tiam batalanta kontraŭ Hispanio, ne estis tre oportuna atendo-loko.

Ĉapitro 35

Daŭrigo pri la instrukcioj ricevataj de don Quijote por la elsorĉo de Dulcinea, kun aliaj mirindaj aferoj

Ili vidis ke, laŭ la takto de ĉi agrabla muziko, proksimiĝas ĉaro el la nomataj triumfaj, ke ĝin tiras ses grizaj muloj kovritaj per blankaj toloj, kaj ke sur ĉiu besto sidas unu pentofaranto en blanka robo, kun granda, luma torĉo vaksa en la mano. La ĉaro estis duoble aŭ trioble pli granda ol la antaŭaj, kaj sur ties flankoj kaj supro troviĝis aliaj dek du pentofarantoj, blankaj kiel la neĝo kun siaj lumaj torĉoj. Kaj ĉi spektaklo kaŭzis admiron kaj teruron en la sama tempo. Sur alta trono sidis nimfo en mil vualoj el arĝenta gazo, sur kiuj glimis nekalkulebla nombro da oraj grajnetoj, kio donis al ŝi, se ne tre riĉan, almenaŭ tre brilan aspekton. Ŝian vizaĝon kovris silka vualo tiel delikata kaj diafana, ke, inter la fadenoj de ĝia vefto, videblis la belegaj trajtoj de pucelo, dum la multaj lumoj permesis distingi ŝian belon kaj krome ŝian aĝon, ĉar ŝi ŝajnis havi ne pli ol dudek jarojn nek malpli ol dek sep. Apud ŝi sidis figuro en longa robo ĝispieda, kun la kapo kovrita per nigra vualo. Tuj kiam la ĉaro alvenis antaŭ la gedukoj kaj don Quijote, ĉesis la muziko de la ŝalmoj kaj poste de la harpoj kaj liutoj sonantaj en la veturilo. Poste la figuro en la longa robo stariĝis, detiris ĝin ambaŭflanken, levis la vualon de sur la vizaĝo, kaj montriĝis la figuro mem de la Morto, ĉe kies aspekto hida kaj senkarna don Quijote sentis korporemon kaj Sancho teruron, dum la gedukoj simulis havi iom da timo. Ĉi viva Morto, jam surpieda kaj rekta, komencis paroli kun voĉo svena kaj lango ne tre vigla:

Merlín mi estas, kiun, laŭ la libroj,
generis, kiel patro, la diablo
(mensogo sankciita de la tempo).
Mi estas princo de magio, reĝo
de la sekretaj scioj zoroastraj
kaj sentas abomenon al epokoj
obstinaj ignoradi la prodaĵojn
de la vagantaj kavaliroj bravaj
de mi amataj ĉiam plej elkore.
Kaj, kvankam la naturo de sorĉistoj
kaj de aliaj magiistoj mavas,
la mia molas, plenas de tenero,
inklinas fari bonon al la homoj.
En la tenebra kavo de Plutono,
kie mi distris min per desegnado
de romboj kaj figuroj horoskopaj,
mi trafis vea kaj lamenta voĉo
de Dulcinea del Toboso rava.
Eksciis mi pri ŝia misfortuno,
pri ŝia ŝanĝo el nobela damo
en aĉan kampulinon; afliktite,
mi forte puŝis la animon mian
en ĉi hororan kaj skeletan formon,
kaj nur studinte pli ol cent mil librojn
de ĉi scienco fia kaj demonia,
mi trovis la rimedon, kiu povas
la finon meti al turmento ŝia.
Ho vi, honoro, gloro de la viroj
kovritaj per kirasoj ŝtalaj, duraj.
Ho vi, lanterno, nordo, lumo, pado
de kiuj skuas for de si la dormon
kaj, forlasinte la mol-litan tenton,
sin hardas en medioj plej rigoraj
per razaj bataliloj sango-verŝaj.
Al vi mi diras, ho hero' unika
ankoraŭ ne sufiĉe prikantata,

kuraĝa kaj prudenta don Quijote,
splendoro de La Mancha, glor' hispana,
ke, por ke Dulcinea del Toboso
revenu al unua stato sia,
necesas jen, ke Sancho, la ŝildisto,
sin punu per tri mil tri cent vip-batoj
sur siaj du ampleksaj sido-vangoj
metitaj el aero, kaj tiele,
ke l' battoj lin doloru, ĝenu, piku.
Interkonsentis tion la kulpantoj
je ŝia trista kaj amara stato.
Kaj mi, sinjoro, venis vin informi.

—Ho ne, mi ĵuras, ke ne! —kriis Sancho—. Tri mil vergoj! Eĉ ne tri! Tiel certe, kiel mi ne ponardus al mi tri fojojn! Mi ne sciis, ke ĉi ensorĉoj havas ion komunan kun miaj sid-vangoj. Je Dio, se sinjoro Merlín ne trovis alian sistemon por elsorĉi sinjorinon Dulcinea de El Toboso, ensorĉita ŝi iros al la tombo.

—Mi prenos vin, sinjoro fripono, ajlo-gluta kreteno —kriis don Quijote—, alligos vin, nuda, kia oni vin naskis, al arbo, kaj vipos vin, ne tri mil tri cent fojojn, sed ses mil ses cent, tiel forte, ke vi ne povos forviŝi de vi la kontuzojn eĉ per tri mil tri cent frotoj. Kaj eĉ ne unu vorton respondu al mi, se vi ne volas, ke mi rompu al vi la animon.

Aŭdinte tion, Merlín rimarkis:

—Oni tiel ne procedu: la bona Sancho devas ricevi la vipadon laŭvole, ne perforte, kaj kiam plaĉos al li, ĉar oni ne difinis tempolimon; sed se li deziras, li povas redukti la nombron de la vipobatoj per la duono, se li konsentas ilin ricevi de la mano, eĉ se iom peza, de alia persono.

—Nek de alia persono, nek propra, nek peza, nek pesebla — respondis Sancho—. Nenies mano tuŝu min. Diru, ĉu mi naskis sinjorinon Dulcinea de El Toboso, por ke mia pugo pagu la pekon de ŝiaj okuloj? Nu, mia mastro estas ja parto de ŝia persono, ĉar ĉiumomente li nomas ŝin «mia vivo», «mia koro», «subteno kaj apogo mia», do al li apartenas vipi sin pro ŝi kaj fari ĉion necesan por ŝia elsorĉo. Sed, mi mem vipi min? Mi resinas.^[326]

Apenaŭ Sancho finis paroli, kiam la arĝenta nimfo, kiu sidis apud la spirito de Merlín, stariĝis, retiris la diafanan vualon de la kapo, kaj vidiĝis ŝia vizaĝo pli ol eksterordinare bela. Kun vireca senĝeno kaj voĉo ne tre propra al junulino, ŝi turnis sin al Sancho Panza kaj alparolis lin jene:

—Ho vi mizera ŝildisto, idioto kun korka animo kaj kun koro el roko kaj siliko! Se oni ordonus vin, latrono senhonta, ke vi ĵetu vin de alta turo surteren; se oni petus vin, malamiko de la homa gento, ke vi manĝu unu dekduon da bufoj, du da lacertoj kaj tri da kolubroj; se oni intencus konvinki vin, ke vi murdu vian edzinon kaj viajn filojn per akra kaj sinistra cimitero, ne estus strange, se vi montriĝus kontraŭa kaj necedema. Sed alligi tiom da gravo el tri mil tri cent vipobatoj, kiam eĉ la plej sensignifa bubo el la lernejoj de la Fratoj de la Doktrino ricevas tiom da ili ĉiumonate, konsternas, teruras kaj afliktas la kompatan koron de viaj aŭskultantoj nunaj kaj de la personoj, kiuj aŭdos pri ĉi afero en la futuraj tempoj. Rigardu, ho kraĉinda kaj sensenta besto!, rigardu, mi diras, per viaj okuloj de timema noktuo, al la pupiloj de la miaj, kompareblaj al brilaj steloj, kaj rimarku, kiel ili ploras, kaj kiel la larmoj formas fadenon post fadeno kaj bobenon post bobeno kaj faras sulkojn, padojn kaj vojojn sur la belaj kampoj de miaj vangoj. Malica kaj misintenca monstro, kortuŝu vin la fakto, ke mia floranta aĝo, ankoraŭ en la limo de la dekelkaj jaroj, ĉar mi havas dek naŭ kaj ne atingas dudek, konsumiĝas kaj velkas sub la

dika haŭto de rustika kampulino; kaj se nun mi ne havas ĉi tian ŝajnon, tio ŝuldiĝas al speciala favoro, kiun sinjoro Merlín, ĉi tie sidanta, faris al mi, nur por ke mia belo tuŝu al vi en la koron: ĉar la larmoj de afliktita ĉarmulino turnas rokon en kotonon kaj tigron en ŝafidon. Vipu, vipu al vi sur vian karn-abundon, vi sovaĝa besto; elŝiru de ties torporo vian spiriton, kiu instigas vin nur manĝi kaj pli manĝi, kaj donu la liberon al la glato de mia haŭto, al la mildo de mia karaktero kaj al la belo de mia vizaĝo. Sed, se malgraŭ mia stato vi ne moliĝas min vidante, nek bolas vin submeti al akceptindaj kondiĉoj, tiam, cedu por la bono de tiu povra kavaliro, staranta ĉe via flanko; mi volas diri, por la bono de via mastro, kies animon mi vidas preskaŭ ekster li, jam inter la gorĝo kaj la lipoj; kaj ĝi atendas nur vian respondon, duran aŭ molan, por tute eskapi tra lia buŝo aŭ por regliti al la fundo de lia stomako.

Aŭdante tion, don Quijote palpis al si la gorĝon, turnis sin al la duko kaj diris:

—Je Dio, sinjoro, Dulcinea pravas. Mi havas la animon transverse metita en la gorĝo, kiel la nukso de arbalesto.^[327]

—Nu, Sancho, kion vi opinias? —demandis la dukino.

—Mi opinias la samon kiel antaŭe —respondis la ŝildisto—. Mi resinas la vipadon.

—«Rezignas», vi devas diri, Sancho —korektis la duko—. Ne «resinas».

—Via grandeco lasu min —respondis Sancho—. Ne estas nun la ĝusta momento, por ke mi donu mian atenton al subtilaĵoj aŭ al litero plia aŭ malplia: ĉar ĉi afero de la vipado, kiun mi devas ricevi de alia aŭ mem doni al mi, tiel konsternas min, ke mi ne scias kion mi diras aŭ faras. Sed mi volus scii de la

sinjorino, nu, de sinjorino Dulcinea de El Toboso, kie ŝi lernis sian manieron peti: ŝi petas min, ke mi disŝiru al mi la karnon per vipu, kaj krome nomas min kork-anima kaj sovaĝa besto, kaj ĵetas sur min veran litanion da insultoj, kiun la diablo toleru, ne mi. Ĉu eble mi havas karnon el bronzo? Ĉu iel min koncernas, ke ŝi estas ensorcĉita aŭ ne? Ĉu ŝi donis al mi ajnan korbon plenan de tolaĵo, ĉemizoj, kapotukoj aŭ ŝtrumpoj (kvankam mi ne uzas ilin) por moligi mian koron? Ne. Nur insulton post insulto mi ricevas, kvankam ŝi scias la konatan proverbon: «Azeno ŝarĝita per oro facile surpriras monton» kaj «Donacoj rompas rokojn» kaj «Preĝon faru, sed farunon preparu» kaj «Pli bonas “jen prenu” ol granda “morgaŭ venu”». Kaj aldone, mia sinjoro kaj mastro, kiu devus karesi al mi la kapon kaj flati min, por ke mi moliĝu kiel lano aŭ kardita kotono, diras, ke, se li prenos min, li alligos min nuda al arbo kaj donos al mi duoblan dozon da vergoj. Ĉi kompatemaj sinjoroj devus konsideri, ke ili petas, ne nur la ŝildiston, sed ankaŭ la gubernatoron, ke li sin vipu; kiel la proverbo diras: «Sur la kuko, mielo».^[328] Lernu, sinjoroj (la diablo vin prenu), lernu peti, supliki kaj kondukti ĝentile: ĉar la tempo ne ĉiam prezentas la saman vizaĝon, nek la homoj havas konstante bonan humoron. Mi mortas nun de ĉagreno, vidante mian verdan sajnon ŝirita, kaj aldone oni petas min, ke mi vipu min propravole, kion mi tiel volonte deziras fari, kiel turni min en indianon.

—Tiam, sciu, amiko Sancho —diris la duko—, ke, se vi ne moliĝos kiel matura figo, vi ne metos la manon en la gubernatorecon. Estus bele, se mi sendus al miaj insulanoj kruelan gubernatoron kun koro el ŝtono, indiferenta antaŭ la larmoj de afliktaj puceloj kaj antaŭ la suplikoj de prudentaj, respektindaj kaj antikvaj saĝuloj kaj sorĉistoj. Unuvorte, Sancho, aŭ vi vipos vin aŭ estos vipata, aŭ vi ne okupos la gubernatoran postenon.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Ĉu mi povus disponi du tagojn por mediti kion mi devus fari?

—Absolute ne —intervenis Merlín—. Ĉi-loke kaj ĉi-momente oni decidu la aferon: aŭ Dulcinea reiros en la kavernon de Montesinos kaj reprenos sian antaŭan figuron de kampulino, aŭ oni ŝin transportos, en ŝia nuna stato, al la Elizeaj kampoj, kie ŝi atendos, ĝis oni plenumos la vipadon ĝis la lasta bato.

—Nu, bone Sancho —diris la dukino—. Estu kuraĝa kaj montru vian dankemon pro la pano, kiun vi manĝas de don Quijote, kies personon ni devas servi kaj kontentigi, se konsideri lian belan karakteron kaj lian altan kavalirecon. Konsentu ĉi vipadon, filo, iru la diablo al la diablo, kaj la timo al la timuloj: ĉar «kuraĝa koro venkas super la mava fortuno», kiel vi bone scias.

Antaŭ ĉi konsilo, Sancho reagis, turnante sin al Merlín kaj farante al li la jenan, tute eksterteman rimarkon:

—Diru al mi, sinjoro Merlín: kiam alvenis ĉi tien la diablo-kuriero, li komunikis al mia mastro mesaĝon de sinjoro Montesinos, ke li atendu lin ĉi tie, ĉar li donus al la instrukcion pri la elsorĉo de sinjorino doña Dulcinea de El Toboso. Kaj ĝis nun, mi ne vidis Montesinos, nek ajnan personon similan.

—La diablo, amiko Sancho —respondis Merlín—, estas azeno kaj grandega fripono; mi sendis lin serĉi vian mastron, kaj li portis mesaĝon, ne de Montesinos, sed de mi, ĉar Montesinos troviĝas en sia kaverno atendante, aŭ pli ĝuste, esperante sian elsorĉon, ĉar ankoraŭ mankas al ĝi multe por elbobeni. Se li ŝuldas ion al vi, aŭ se vi devas fari ian negocon kun li, mi prenos lin al vi. Sed nun, filo, konsentu submeti vin al vipo kaj, kredu min, ĝi tre utilos al via animo

kaj al via korpo: al via animo, ĉar vi plenumos agon mizerikordan; kaj al via korpo, ĉar vi havas kongestan kompleksion, kaj konvenos al vi perdi iomete da sango.

—Multaj doktoroj ekzistas en la mondo. Eĉ la sorĉistoj kuracas —respondis Sancho—. Nu, tial, ke ĉiuj opinias same rilate al ĉi afero de la vipado, kvankam mi ne trovas ĝin necesa, mi diras, ke mi konsentas doni al mi la tri mil cent vergojn, sed sub la kondiĉo, ke tio okazos, kiam plaĉos al mi, sen ke oni trudu al mi ian limon en la tempo; kaj mi penos kvitigi min de ĉi ŝuldo kiel eble plej baldaŭ, por ke la mondo ĝuu la belon de sinjorino doña Dulcinea de El Toboso, ĉar, male ol mi pensis, ŝajnas, ke ŝi vere belas. Ekzistu ankaŭ la kondiĉo, ke oni ne devigos min, ke mi min vipu ĝissange, kaj ke, se kelkaj batoj apenaŭ tuŝos la haŭton, ankaŭ ili estos validaj. Krome, se mi miskalkulos la vergojn, tiam sinjoro Merlín zorge kontrolu ilin, ĉar li ĉion scias, kaj ne forgesus sciigi min, kiom da ili plios aŭ malplios.

—Ne necesas sciigi pri la pliaj, ĉar en la momento mem, kiam vi atingos la ĝustan nombron, sinjorino Dulcinea elsorĉiĝos kaj venos danki la bonan Sancho kaj eĉ faros al li donacon pro lia bona ago. Tiel do, ne zorgu pri la plioj aŭ malplioj, kaj la ĉielo ne permesu, ke mi trompu ajnan personon, eĉ ne unu solan haron de lia kapo.

—Nu, bone, mi metas min en la manojn de Dio kaj akceptas mian mavan sorton —diris Sancho—. Mi volas diri, ke mi akceptas la vipadon, sed kun la menciitaj kondiĉoj.

Apenaŭ Sancho finis paroli, kiam denove sonis la muziko de la ŝalmoj, kaj oni pafis per nekalkuleblaj arkebuzoj. Don Quijote kroĉis sin al la kolo de Sancho kaj donis al li mil kisojn sur la frunto kaj la vangoj. La duko, la dukino kaj la ceteraj ĉeestantoj montris esprimon de ega kontento, kaj la ĉaro komencis veturi. Kaj la bela Dulcinea, pasante, klinis la

kapon antaŭ la gedukoj kaj faris grandan riverencon al Sancho.

Ĉe tio la gaja kaj ridanta aŭtoro leviĝis rapide; la floretoj de la kampoj rektigis sian kapon kaj la likvaj kristaloj de la rojoj murmuris inter blankaj kaj grizaj ŝtonetoj kaj fluis, por pagi sian tributon, al la riveroj ilin atendantaj. La ĝoja tero, la hela ĉielo, la pura aero kaj la serena lumo, kune aŭ ĉiu per si, montris evidentan signon, ke la tago, komencanta jam paŝi sur la jupo de la aŭroro, estus klara kaj kvieta. Kontentaj je la ĉaso kaj je la sukcesa plenumiĝo de siaj planoj, la gedukoj revenis al la kastelo kun la intenco daŭrigi la mistifikon, ĉar nenio alia povus doni al ili pli grandan plezuron.

[326] Misprononcita «Mi rezignas».

[327] Turnebla peceto uzata por streĉi la ŝnuron de la tiamaj arbalestoj.

[328] Proverba esprimo, por aludi, ke bona aŭ favora afero ricevas aldonan konvenaĵon. Ĉi tie, Sancho uzas la frazon en ironia senco.

Ĉapitro 36

Pri la stranga kaj neimagebla aventuro de la duenjo Dolorida, alnomo de la grafino Trifaldi, kaj pri uno letero, kiun Sancho skribis al sia edzino Teresa Panza

La majordomo de la duko, viro de burleska kaj sprita humoro, aranĝis la spektaklon de la lasta aventuro, ludis la rolon de Merlín, verkis la poemon kaj disponis, ke paĝio prezentu sin en la figuro de Dulcinea. Nun, kun la interveno de siaj gemastroj, la majordomo organizis alian plej amuzan kaj strangan mistifikon imageblan.

La sekvantan tagon, la dukino demandis al la ŝildisto, ĉu li jam komencis la sinpunon por la elsorĉo de Dulcinea. Li respondis, ke jes, kaj ke, jam en la nokto, li donis al si kvin batojn. La dukino demandis, per kio li sin batis, kaj Sancho diris, ke per la mano.

—Tio —respondis la dukino— pli ol vipobatoj estas manfrapoj. Mi opinias, ke la saĝa Merlín ne kontentos je via sinindulgo. Necesas, ke la bona Sancho uzu skurĝon kun rimenoj garnitaj sur la pintoj per ŝtalaj dornoj aŭ per nodoj, ke ili lin doloru: ĉar, «por lerni funde, penadu profunde», kaj oni ne devas akiri tiel ĉipe la liberigon de tiel granda damo kiel Dulcinea. Memoru, Sancho, ke bonfari duonhezite kaj nevoleme havas nenian meriton aŭ valoron.

—Donu al mi skurĝon aŭ taŭgan rimenon —respondis Sancho— kaj mi batos min per ĝi, se nur ĝi ne kaŭzos tro da doloro. Sciu, sinjorino, ke, kvankam mi estas vilaĝano, mia karno pli similas kotonon ol kanabon, kaj ne justus, se mi draŝus min je la profito de aliaj personoj.

—Tre bone— diris la dukino—. Morgaŭ mi donos al vi taŭgan skurĝon mole adapteblan al via delikata karno, kvazaŭ ĉi lasta estus fratino de la batilo.

—Mi devas diri al vi, Via Alteco kaj sinjorino mia —respondis Sancho—, ke mi jam skribis leteron al mia edzino Teresa por informi al ŝi pri ĉio okazinta de kiam mi foriris de ŝia flanko. Mi havas la leteron ĉi tie, ĉe la brusto, kaj mankas nur alskribi la adreson. Mi volus, ke Via Saĝeco legu ĝin, ĉar mi opinias ĝin propra al gubernatoro, mi volas diri, laŭa al la stilo, kiun sendube uzas la gubernatoroj.

—Kiu diktis ĝin? —demandis la dukino.

—Kiu, se ne ĉi povra pekanto, mi mem?

—Ĉu vi ankaŭ skribis ĝin?

—Tute ne. Mi ne scias legi aŭ skribi, nur signaturi.

—Ni vidu la leteron —diris la dukino—. Sendube ĝi montros la amplekson kaj la kapablon de via talento.

Sancho tiris de sia brusto leteron ne sigelitan, la dukino ĝin prenis kaj legis la jenon:

Letero de Sancho Panza al lia edzino Teresa Panza

Oni skurĝis min senpaŭze, sed mi rajdis bonan beston. [\[329\]](#) Se mi havas bonan regnon, per vipado mi ĝin pagas. Vi ne komprenos nun ĉi tion, kara Teresa, sed vi scios siatempe. Mi volas informi vin, edzino, ke mi decidis, ke vi uzu propran veturilon, kiel decas, ĉar la ceteraj vojaĝomanieroj estas kvazaŭ iri sur kvar piedoj. Vi estas edzino de gubernatoro: la homoj gardu sin kritiki kaj priklaĉi vin! Mi kunsendas verdan ĉas-

kostumon al mi donacitan de mia sinjorino la dukino. Faru el ĝi jupon kaj korsaĵon por nia filino. Mi aŭdis en ĉi lando, ke don Quijote, mia mastro, estas sanamensa frenezulo kaj amuza idioto, kaj ke mi povas konkuri kun li ĉi-rilate. Ni vizitis la kavernon de Montesinos, kaj la saĝulo Merlín volis, ke la elsorĉo de Dulcinea de El Toboso, nomata Aldonza Lorenzo tie inter vi, okazu pere de mi. Tri mil tri cent vipobatojn, minus kvin, mi devas doni al mi, por ke ŝi vidu sin tiel elsorĉita, kiel la patrino ŝin naskinta. Gardu la sekreton pri ĉi afero, ĉar, kion oni diskonigas en la placo, tion kelkaj uloj opinias blanka, kaj aliaj nigra. Post kelkaj tagoj, mi iros okupi mian gubernatoran postenon, kaj min akompanos la grandega deziro riĉigi min, ĉar mi aŭdis ke, en nia epoko, la novaj gubernatoroj havas senescepte tiun saman intencon. Mi esploros la terenon kaj sciigos vin, ĉu konvenas, ke vi venu ĉi tien aŭ ne. La grizulo bone fartas kaj sendas al vi siajn salutojn: mi ne pensas forlasi ĝin, eĉ se oni levus min al la ofico de sultano de Turkujo. Mia sinjorino la dukino kisas al vi milfoje la manojn; sendu al ŝi returne du mil kisojn, ĉar, laŭ diro de mia mastro, nenio kostas kaj valoras tiel ete, kiel la belaj komplimentoj. Dio ne degnis havigi al mi alian valizon kun cent eskudoj, kiel la iama, sed ne zorgu, kara Teresa, ĉar, kiu donas la alarmon, en la turo sin protektas, kaj, kiam mi funkcios gubernatore, ĉio solviĝos laŭ miaj deziroj. Nur unu afero perturbas min: laŭdire, gustumi la regadon donas egan plezuron al la regantoj, ĝis la ekstremo, ke ili manĝas al si la manojn ĝis la kubuto. Se tiel, la gubernatoreco kostus al mi ne ĉipe, kvankam la kriplaj jam ĝuas sian sinekuron almozante.^[330] Tiel do, iel aŭ alie, vi estos riĉa kaj bonsorta. Do vin benu, kaj min gardu, por ke mi povu servi vin. De ĉi kastelo, la 20-an de julio de 1614. Via edzo, la gubernatoro, Sancho Panza.

Leginte la leteron, la dukino diris al Sancho:

—Nia bona gubernatoro iom eraras rilate al du aferoj. Unue vi diras, aŭ sugestas, ke oni donis al vi la gubernatorecon interŝanĝe por la vipado, kiun vi devas apliki al vi; kaj vi bone scias, kaj ne povas nei, ke mia sinjoro la duko promesis al vi la insulon, kiam oni eĉ ne sonĝis, ke vipadoj ekzistas en la mondo. Due, vi montriĝas tro monavida, kaj ne plaĉus al mi, ke vi trompus nian esperon: ĉar sako tro plena diskrevas, kaj profitema gubernatoro ne regas juste.

—Mi ne volis tiom diri en la letero —respondis Sancho—. Kaj se via moŝto opinias ĝin nesendinda, nu, sufiĉas ĝin disŝiri kaj skribi alian; kvankam eble la nova letero estus pli mava, se ĝi originus en mia kapo.

—Ne, ne —respondis la dukino—. Ĉi letero bonas, kaj mi deziras, ke la duko ĝin legu.

Poste ili iris al ĝardeno, por manĝi tie; la dukino montris al sia edzo la leteron de Sancho, kaj la duko legis ĝin kun granda plezuro. Ili manĝis kaj, post ol oni demetis la tablotukon, kaj la gedukoj longe amuziĝis per la ĝuinda konversacio de Sancho, aŭdiĝis subite la tristega sono de fifro kaj la raŭka kaj disonanca bruo de tamburo. Ĉiuj montris alarmon ĉe tia muziko konfuza, milita kaj melankolia, precipe don Quijote, nekapabla sidi senmova pro sia ekscitiĝo. Kaj, kion diri pri Sancho? Nur, ke la timo puŝis lin al sia kutima ŝirmejo, t.e. al la flanko de la dukino aŭ en ŝian jupon, ĉar verdire la muziko sonis plej triste kaj melankolie. Oni aŭskultis silente kaj streĉe, kaj tiam vidis alveni tra la ĝardeno du virojn en funebraj roboj tiel longaj, ke ili trenis larĝan voston sur la tero. La funebroloj batis sur du grandaj tamburoj kovritaj per nigraj drapoj, kaj ĉe ilia flanko iris la ludanto de la fifro, same en robo peĉe nigra.

La trion sekvis ulo de giganta staturo, envolvita, pli ĝuste ol vestita, en eksterordinare nigra mantelo, kies vosto same tre

longis. Sur la mantelo li portis larĝan balteon nigran, kaj enorma cimitaro kun ingo kaj tenilo nigraj pendis de ĝi. Lian vizaĝon kovris diafana vualo nigra, kaj tra ĝi duonvidiĝis longega barbo blanka kiel la neĝo. Li paŝis laŭ la takto de la tamburoj lante kaj solene. Unuvorte, ĉe lia kresko, lia majesta paŝado, lia funebro kaj lia eskorto, la personoj rigardantaj, kiuj ne konis lin, sentis sin frapitaj de miro. Lante kaj ceremonie, kiel dirite, li genuiĝis antaŭ la duko, kiu atendis stare kun la aliaj. Sed la duko diris al la funebrulo, ke li permesus lin paroli, nur kiam li stariĝus. La mirveka kvazaŭfantomo obeis kaj, jam surpiede, levis la maskon de sur sia vizaĝo kaj montris la plej teruran, plej longan kaj plej densan barbon, neniam antaŭe vidatan de homaj okuloj. Poste, voĉo profunda kaj resona elpuŝiĝis el lia vasta kaj potenca brusto, kaj, fiksante la rigardon sur la dukon, li diris:

—Altega kaj granda sinjoro: mi nomiĝas Trifaldín la blankabarba kaj estas kaj estas ŝildisto de la grafino Trifaldi, alinome la duenjo Dolorida, je kies nomo mi portas mesaĝon al Via Grandeco. Per ĝi ŝi petas, ke Via Ekscelenco bonvolu permesi ŝin enveni kaj rakonti al vi sian misfortunon, unu el la plej strangaj kaj mirindaj, kian apenaŭ imagus la plej afliktita fantazio de la mondo. Sed unue ŝi deziras scii, ĉu en via kastelo troviĝas la kuraĝa kaj neniam venkita kavaliro don Quijote de La Mancha, ĉar de sia regno de Candaya, ŝi venis piede kaj faste ĝis ĉi ŝtato via, nur por renkonti lin: kaj plenumi tian vojaĝon oni devus konsideri miraklo aŭ rezulto de ensorĉo. Ŝi troviĝas nun ĉe la pordo de ĉi fortreso aŭ kampo-domo kaj nur atendas vian permeson por enveni, Kaj jam mi diris ĉion.

Li tuisis, karesis al si la barbon de supre malsupren per la du manoj, kaj atendis aplombe la respondon de la duko, kiu diris jen:

—Jam de longe, bona ŝildisto Trifaldín la blankabarba, ni scias pri la misfortuno trafinta nian sinjorinon la grafinon Trifaldi, nun alnomatan «la duenjo Dolorida» kaŭze de la sorĉistoj. Vi povas, brava ŝildisto, diri al ŝi, ke ŝi envenu, kaj ke ĉi tie troviĝas la kuraĝa kavaliro don Quijote de La Mancha, de kies sindona naturo ŝi certe povas atendi ĉian helpon kaj protekton. De mia flanko, diru al ŝi ankaŭ, ke, se ŝi bezonas mian favoron, ĝi ne mankos al ŝi: ĉar pro mia kavaliereco mi havas la devon helpi ĉian virinon, ĉefe se temas pri duenjoj vidviniĝintaj, afliktitaj kaj forlasitaj, kia certe estas via sinjorino.

Tion aŭdinte, Trifaldín klinis la genuon ĝis la tero, faris signon al la viroj kun la fifro kaj tamburoj, ke ili reludu kaj, je la samaj muziko kaj takto, li elpaŝis, dum la aliaj restis en la ĝardeno plenaj de miro ĉe liaj aspekto kaj teniĝo.

La duko turnis sin al don Quijote kaj diris:

—Certe, renoma kavaliro, la tenebro de la malico kaj la nescio ne povas kaŝi aŭ vuali la brilon de la kuraĝo kaj virto. Mi tion diras, ĉar vi gastas en ĉi kastelo apenaŭ ses tagojn kaj, dank' al viaj prodaĵoj, famaj ĉirkaŭ la konata mondo, la homoj afliktitaj kaj senfortunaj, certaj trovi en la forto de via brako la rimedon kontraŭ sia sufero kaj angoro, jam venas serĉi vin de foraj kaj distaj landoj, ne en kaleŝoj aŭ sur dromedaroj, sed piede kaj faste.

—Mi dezirus, sinjoro duko —respondis don Quijote—, vidi nun ĉi tie la benindan klerikon kiu, antaŭ kelkaj tagoj, montris ĉe la tablo tiel grandan malbonvolon kaj antipation kontraŭ la vagantaj kavaliroj. Li observus propraokule, ĉu tiaj kavaliroj necesas en la mondo, kaj konstatus, ke la profunde afliktitaj kaj senkonsolaj, premataj de enormaj misfortunoj, turnas sin por helpo, ne al la hejmo de la letruloj, nek al la sakristianoj de la vilaĝoj, nek al la

kavaliroj, kiuj neniam eliras ekster la limoj de sia urbo, nek al la pigraj korteganoj pli inklinaj serĉi novaĵon por ĝin rakonti kaj ripeti ol plenumi grandajn farojn kaj prodaĵojn, por ke aliaj ilin rakontu kaj skribu. La rimedo al la misfortunoj kaj al la mizero, la konsolo al la vidvinoj, la protekto al la puceloj troveblas ĉe la vagantaj kavaliroj multe pli facile ol ĉe la ceteraj personoj. Kaj mi senlime dankas la ĉielon, ke mi estas tia kavaliro, kaj ne plendas, kiam mi ricevas ofendon aŭ elportas rigoran penadon en ĉi honora profesio. Venu ĉi duenjo kaj petu de mi ion ajn: la forto de mia brako kaj la kuraĝo de mia spirito havigos al ŝi la necesan rimedon.

[329] Ĉi tiu komenca frazo de Sancho ŝajnas formita el du versoj de olda romanco aludantaj al ia kondamnito, kiu, rajde sur azeno, ricevas vipobatojn, dum oni lin kondukas tra la ĉefaj stratoj, laŭ la kutimo de la tiama epoko.

[330] Per ĉi tiuj vortoj Cervantes amare aludas sin mem: en siaj lastaj jaroj li vidis sin kripla kaj paŭpera kaj devis serĉi monan helpon, la «sinekuron de la almozo», ĉe kelkaj potenculoj kiel la duko de Béjar, la grafo de Lemos aŭ la kardinalo Sandoval y Rojas.

Ĉapitro 37

Kun la daŭrigo de la fama aventuro de la duenjo
Dolorida

La duko kaj la dukino tre ĝojis, vidante, kiel bele don Quijote reagis al iliaj planoj. Sed tiam diris Sancho.

—Mi ne volus, ke ĉi moŝta duenjo venus ĵeti bastonon en la radon de mia gubernatoreco: ĉar mi aŭdis unu apotekiston de Toledo aserti (kaj li parolis kiel najtingalo), ke, kiam la duenjoj miksas sin en ian aferon, nenio bona rezultas el ilia interveno. Je Dio, la apotekisto havis veran antipation kontraŭ ili! Kaj mi pensas, ke, se la duenjoj de ĉia kvalito kaj rango montriĝas senescepte tedaj kaj impertinentaj, kiel montriĝos duenjo, krome afliktita, kia laŭdire estas ĉi grafino tri-falda aŭ trimil-falta?

—Silentu, amiko —diris don Quijote—. Se ĉi damo venas serĉi min de tiel fora lando, certe ŝi ne apartenas al la rondo de la duenjoj menciitaj de la apotekisto, des malpli, ke ŝi estas grafino, kaj, kiam grafinoj servas kiel duenjoj, ili devas servi reĝinon aŭ imperiestrinon, ĉar en siaj hejmoj ili havas moŝtan rangon, kaj aliaj duenjoj servas ilin.

Doña Rodríguez troviĝis tie kaj diris al tio:

—Mia sinjorino la dukino havas por sia servo duenjojn, kiuj povus esti grafinoj, se la sorto tion volus; sed «kion ordonas reĝo, tio fariĝas leĝo»; kaj oni ne klaĉu pri la duenjoj, des malpli, kiam ili estas oldaj puceloj: ĉar, kvankam mi ne apartenas al tia kategorio, mi bone komprenas la avantaĝon de duenjo-pucelo super duenjo-vidvino. Kaj, kiu nin tondis, tenas ankoraŭ la tondilon en la mano.^[331]

—Tamen —respondis Sancho— la duenjoj meritas tielan tondadon, laŭ mia barbiro, ke prefere ni ne removu la rizon, eĉ se ĝi kungluiĝas.^[332]

—La ŝildistoj —diris doña Rodríguez— ĉiam malamikis al ni, ĉar, tial, ke ili estas la koboldoj de la antaŭĉambroj kaj vidas nin ĉiupaŝe, ili dediĉas sin klaĉi pri ni, fosante en nian paseon kaj detruante nian reputacion anstataŭ preĝi en sia libera tempo. Sed mi diru al tiuj moveblaj ŝtupoj,^[333] ke, spite al ili, ni plu loĝos en la palacoj de la mondo, eĉ mortante de malsato kaj kovrante per nigra robo monaĥinstila nian delikatan, aŭ ne delikatan, karnon, same kiel oni kovras kelkfoje sterk-amason per tapiŝo en la tagoj de religiaj procesioj. Vere, se oni donus al mi permeson, kaj la momento estus oportuna, mi igus kompreni, ne nur al la ĉeestantoj, sed al la tuta mondo, ke ne ekzistas virto ne trovebla ĉe la duenjoj.

—Mi kredas —diris la dukino—, ke mia bona doña Rodríguez absolute pravas: sed konvenus, ke ŝi atendu pli taŭgan momenton por pledi por si kaj por la ceteraj duenjoj, por refuti la mavan opinion de tiu malica apotekisto, kaj por elŝiri ĝin el la koro de la granda Sancho.

—De kiam mi komencis flari la odoron de gubernatoreco —respondis Sancho—, mi ne plu sentas min ŝildisto, kaj la tuta duenjaro de la mondo havas por mi malpli da valoro ol seka figo.

Oni certe daŭrigus la konversacion kun la duenjo, se tiam ne aŭdiĝus la fifro kaj la tamburoj anoncantaj, ke jam proksimiĝas la duenjo Dolorida. La dukino demandis al sia edzo, ĉu estus bone iri akcepti ŝin, se konsideri ŝian moŝtan rangon de grafino.

—Pro ŝia grafineco —diris Sancho, antaŭ ol la duko povus respondi—, ŝajnas dece, ke Viaj Grandecoj iru akcepti ŝin; sed pro ŝia karaktero de duenjo, mi opinias, ke vi devas movi vin eĉ ne per unu paŝo.

—Kiu petis vian intervenon en ĉi afero, Sancho? —demandis don Quijote.

—Kiu, sinjoro? —respondis Sancho—. Mi intervenas proprainiciate, ĉar mi rajtas tion fari kiel ŝildisto lerninta la regularon de la ĝentilo en la skolo de via moŝto, la kavaliro plej rafinita kaj ĝentila en la regno de la bona edukiteco. Kaj mi aŭdis vian moŝton diri, ke, en ĉi aferoj, tiel multe oni perdas per troa, kiel per maltroa komplimento; kaj al bona komprenanto, nur kelkaj vortoj sufiĉas.

—Sancho pravas —diris la duko—. Ni vidu la aspekton de la grafino, kaj ni mezuros laŭ ĝi la ĝentilaĵon al ŝi ŝuldatan.

Ĉe tio enpaŝis, kiel la unuan fojon, la viroj kun la fifro kaj la tamburoj. Kaj la aŭtoro finas ĉi kurtan ĉapitron kaj komencas la sekvantan, kie oni plu traktas la saman aventuron, unu el la plej rimarkindaj de la libro.

[331] Kaj eble, per la sama tondilo oni povus tondi ankaŭ lin. «Tondi» havas ĉi tie la sencon «priklaĉi», «kritiki», kiel en la respondo de Sancho.

[332] Proverba esprimo. Temas, kompreneble, pri la rizo kuiriĝanta. En figura senco: preferindas akcepti certan damaĝon aŭ kontraŭaĵon, se per tio oni evitas alian pli grandan.

[[333](#)] Per ĉi amuza esprimo, la duenjo nomas la ŝildistojn pigraj kaj dormemaj.

Ĉapitro 38

La duenjo Dolorida rakontas sian misfortunon

Post la tristaj muzikantoj, komencis eniri en la ĝardenon kelkaj duenjoj ĝis la nombro de dek du en du vicoj, en larĝaj monaĥinaj roboj ŝajne el fulita serĝo kaj kun blankaj vualoj muslinaj, tiel longaj, ke nur la rando de ilia robo vidiĝis. Post ili venis la grafino Trifaldi, kiun kondukis je la mano la ŝildisto Trifaldín la blankabarba; ŝi surhavis tre fajnan nigran lanaĵon ne frizitan, ĉar se ĝi estus frizita, la grajnoj de la vefto vidiĝus tiel grandaj kiel bonaj kikeroj de Martos. La vosto de la robo konsistis el tri trenaĵoj, kaj tri paĝioj same en funebra kostumo tenis ilin je la pintoj kaj formis belan geometrian figuron per la akutaj anguloj de la trenaĵoj: tiam la ĉeestantoj komprenis, ke la damo nomiĝas la grafino Trifaldi kaŭze de la tri faldoj de sia vosto. Kaj Benengeli diras, ke, efektive, ili pravis, ĉar vere ŝi nomiĝis grafino Lobuna, ĉar en ŝia graflando multis lupoj, kaj se anstataŭe multus vulpinoj, ŝi nomiĝus grafino Zorruna,^[334] tial ke, laŭ kutimo reganta en la parto de la mondo, kie ŝi loĝis, la senjoroj donis al si la nomon de tio plej abunda en siaj ŝtatoj. Tamen ĉi grafino, por celebri la originalecon de sia robo, forlasis la nomon de Lobuna kaj igis ŝin nomi Trifaldi. La dek du duenjoj kaj ties mastrino marŝis per procesiaj paŝoj, kaj ilian vizaĝon kovris nigraj vualoj, ne diafanaj kiel la vualo de Trifaldín, sed tiel densaj, ke absolute nenio travidiĝis.

Tuj kiam la tuta eskadrono de duenjoj paŝis en la ĝardenon, la gedukoj kaj don Quijote stariĝis, same kiel la ceteraj rigardantoj de la tuta procesio. La dek du duenjoj haltis, kaj inter la du vicoj avancis Dolorida sen delasi la manon de Trifaldín. Ĉe tio la gedukoj kaj don Quijote antaŭeniris

proksimume dek du paŝojn por akcepti ŝin. La grafino genuiĝis kaj kun voĉo pli raŭka kaj profunda ol delikata kaj dolĉa diris:

—Viaj Grandecoj bonvolu ne montri vin tiel ĝentilaj antaŭ ĉi servisto, mi volas diri, antaŭ ĉi servistino via. Tiel profunda aflikto min posedas, ke mi ne kapablas respondi, kiel mi dezirus. Mia stranga kaj senegala misfortuno ŝancelis mian menson ĝis tia grado, ke mi ne scias, kiam ĝi retrovos sian ekvilibron.

—Sinjorino grafino —respondis la duko—. Senmensa estus la homo nekapabla diveni vian indecon per la aspekto de via persono, kiu, sen plia ekzameno, meritas la omaĝon de la kremo de la ĝentilo kaj de la floro de la kortegaj ceremonioj.

Kaj, levinte ŝin je la mano, la duko ŝin kondukis al seĝo apud la dukino, kiu salutis kun granda afablo la damon en funebro. Don Quijote silentis, kaj Sancho ege deziris vidi la vizaĝon de Trifaldi kaj de kelkaj el ŝiaj multaj duenoj, kio ne eblis, ĝis ili propravole kaj siatempe demetis la vualojn. Ĉiu restis senmovaj kaj en silento, atendente, kiu rompus ĝin unue. Tion faris la dueno Dolorida, dirante:

—Mi konfidas, potencega sinjoro, senegale bela sinjorino kaj plej saĝaj akompanantoj, ke mia profunda aflikto trovos en viaj kuraĝaj koroj akcepton tiel favoran, kiel kompatan kaj senrezervan, ĉar ĝi tiel intensas, ke ĝi kapablas likvigi la marmoron, moligi la rokon kaj fandi la ŝtalon de la plej harditaj animoj de la mondo. Sed antaŭ ol mi sciigos mian aflikton al via aŭdo (mi ne volas diri «al viaj oreloj») ege mi ŝatus, se oni informus min, ĉu en ĉi rondo, kunveno aŭ kompanio troviĝas la plej senmakula kavaliro, nome, la enorma don Quijote de La Mancha kaj lia ŝildistego Panza.

—Panza —respondis Sancho, antaŭ ol alia ajn povus paroli— troviĝas ĉi tie kaj ankaŭ la enorma don Quijote. Do, afliktegita duenjego, diru kion vi volas, ĉar ni pretegas esti viaj servistegoj.

Ĉe tio don Quijote stariĝis, turnis sin al la duenjo Dolorida kaj diris:

—Se via misfortuno, angorplena sinjorino, povus iel mildiĝi per la interveno de vaganta kavaliro, mi metas je via dispono la forton kaj kuraĝon de mia brako; eĉ se feblaj kaj nesufiĉaj, mi servos al vi per ili senkondiĉe. Mi estas don Quijote de La Mancha, laŭprofesie devas doni helpon al ĉiaj mizeruloj kaj sekve, sinjorino, vi ne bezonas supliki mian favoron aŭ uzi ĉirkaŭfrazojn; rekte kaj alcele rakontu vian misfortunon, ĉar via aŭskultanto scios, se ne eblus liberigi vin de ĝi, almenaŭ kompati vin elkore.

Ĉe tiaj vortoj, la duenjo Dolorida ŝajnis deziri ĵeti sin al la piedoj de don Quijote, kaj efektive, ŝi ĵetis sin kaj penis ilin ĉirkaŭpremi, dirante:

—Mi ĵetas min al ĉi kruroj kaj piedoj, ho, nevenkita kavaliro, ĉar ili estas la fundamento kaj la kolonioj de la vaganta kavalirismo. Mi volas kisi ĉi piedojn de kies paŝoj pendas kaj dependas la rimedo kontraŭ mia misfortuno, ho vi, kuraĝa vagantao, kies prodaĝoj devancas kaj metas en la ombron la fabelajn farojn de Amadis, Esplandán, Belanís kaj similaj.

Poste ŝi turnis sin al Sancho, prenis liajn manojn kaj daŭrigis:

—Ho vi, plej lojala ŝildisto, kia neniam servis al vaganta kavaliro en la paseo aŭ en la nuno! Vi, kies boneco pli grandas ol la barbo de mia akompananto Trifaldín, fiera pro tio, ke, servante la faman don Quijote, vi simbole servas la tutan bandon de kavaliroj ĝis nun vivintaj en la mondo. Je la

nomo de via fidelega bonkoreco, mi ĵurpetas vin, ke vi efike pledu antaŭ via mastro, por ke li favoru ĉi humilegan kaj mizeregan grafinon.

—Ne koncernas min, sinjorino —respondis Sancho—, ĉu mia boneco grandas kiel la barbo de via ŝildisto. Min interesas nur, ke mia animo havu barbon kaj mustaĉon, kiam ĝi flugos en la transan vivon,^[335] ĉar, rilate al la barboj de nia mondo, mi apenaŭ aŭ tute ne zorgas. Sed necesas nek viaj flatoj nek viaj suplikoj, por ke mi petu mian mastron (mi scias, ke li min amas, ĉefe nun, kiam li bezonas min por certa afero) favori kaj helpi vian moŝton, kiom li povas. Elpaku vian tristan historion, rakontu ĝin, kaj lasu al ni la ceteron, ĉar ni komprenos unu la aliajn.

La gedukoj, kiel organizintoj de ĉi aventuro ĝis ties lastaj detaloj, preskaŭ krevis de rido aŭskultante ĉi konversacion, kaj laŭdis en si la spriton kaj la lertan aktoradon de la grafino Trifaldi. Ĉi lasta denove sidiĝis kaj diris:

—La fama regno Candaya situas inter la granda Trapobana kaj la Suda Maro, ses mejlojn preter kabo Camorín, kaj ĝin mastris la reĝino doña Maguncia, vidvino de la reĝo Archipielo, ŝia sinjoro kaj edzo. El ilia geiĝo venis en la mondon la princino Antonomasia, heredulino de la regno. Ĉi princino kreskis kaj edukiĝis sub mia kuratoreco kaj instruado, ĉar mi estis la plej moŝta kaj malnova duenjo de ŝia patrino. Nu, okazis ke kun la paso de la tempo, tagon post tago Antonomasia atingis la aĝon de dekkvar jaroj, kaj ŝia belo tiom disfloris, ke la Naturo ne povis igi ĝin pli perfekta. Kaj mi konfesu, ke ĉi birdino havis tre akran inteligenton. Nu, ŝia saĝo egalas al ŝia belo, kaj ŝi estis la plej bela en la mondo, pli ĝuste, ŝi estas, se la envia destino aŭ la senkompataj Parcoj ne tondis ankoraŭ la fadenon de ŝia vivo. Sed certe tio ne okazis, ĉar la ĉielo ne toleros, ke oni faru al la tero la teruran mavon detruu la grapolon, ankoraŭ

verdan, de la plej bela vito de la mondo. Ŝia ĉarmo, kiam mia povra lango ne kapablas ĝuste laŭdi, altiris al ŝi la amon de nekalkulebla nombro da princoj enlandaj kaj eksterlandajn kaj, inter ili, unu kortega kavaliro aŭdacis levi sian penson ĝis la ĉielo de ŝia beleco, fidante je sia junco, je sia plaĉa aspekto, je siaj multaj kapabloj kaj je sia facila kaj brila sprito: ĉar mi devas sciigi al Viaj Grandecoj, se mi ne tedas vin, ke li ludis la gitaron tiel bele, ke la instrumento ŝajnis paroli; krome li estas poeto kaj granda dancanto, kaj tiel lerte li faris birdo-kaĝojn, ke, se necese, li povus vivteni sin per tia laboro. Nu, tiom da talentoj kaj kapabloj sufiĉas por renversi monton, des pli do unu delikatan pucelon. Sed lia plaĉa aspekto, lia ĝentilo, lia simpatio kaj liaj konoj fiaskus kontraŭ la fortreso da virto de la knabino, se tiu senhonta fripono ne estus helpinta ŝin per la ruzo manovri komence kontraŭ mi mem. Unue la malica kaj kanajla vagabondo klopodis subfosi mian volon kaj aĉeti mian konsenton por ke mi, mava gardistino, transdonu al li la ŝlosilon de la fortreso. Nu, fine li rompis mian reziston kaj igis min cedi, donacante al mi nombron da bagateloj kaj tombakoj. Sed mia volo definitive disfalis kaj submetiĝis unu nokton, kiam, de kradita fenestro rigardanta al strateto, mi aŭdis lin kanti kelke da koploj. Kaj, se mi bone memoras, jen unu el ili:

Mia damo kruelsente
vundas min en mia koro
kaj eĉ volas kun rigoro,
ke suferu mi silente.

La kanto ŝajnis al mi perle bela kaj lia voĉo sirope miela; kaj de tiam, konsiderante kiom da mavo faris al mi la menciitaj versoj, kaj aliaj de la sama speco, mi opinias, ke la ŝtatoj bone regataj devus, kiel konsilis Platono, ekzili la poetojn, almenaŭ la lascivajn, ĉar iliaj versoj similas, ne al poemoj pri la markizo de Mantua, kiuj amuzas kaj igas plori la infanojn

kaj virinojn, sed al ia speco de pintaj kaj delikataj dornoj kapablaj penetri al ni en la animon kaj ĝin vundi, kiel la fulmoj vundas la korpon kelkfoje sen tuŝi la veston. Kaj poste li kantis:

Venu, morto, pied-ŝove,
ke mi vin ne sentu paŝi,
por ke la plezur' forpasi
ne vivigu min denove.

kaj multe da simila koploj kaj kanzonoj, ĉarmaj, se aŭskultataj, kaj emociaj, se legataj. Kaj kion diri pri unu speco de versaĵo, nomata *seguidilla*, furora tiam en Candaya? Ĝi iĝis la koron danci, la ridon eksplodi kaj la korpon salti; unuvorte, ĝi ŝajnis meti hidrargon en la sentojn. Tial mi diras, sinjoroj, ke oni devus ekzili la menestrelojn al neloĝataj insuloj, kvankam, verdire, ne ili kulpas, sed la stultuloj, kiuj laŭdas ilin, kaj la idiotaj virinoj, kiuj kredas ilin. Kaj se mi kondutus, kiel bona duenjo devus, mi ne estus lasita min kortuŝi de iliaj rebusaj konceptoj, nek kredinta, ke ili parolas la veron, kiam ili diras: vivi mortinte, ardi en la frostoj, tremi en la fajroj, esperi sen espero, foriri sed resti, kune kun multaj aliaj similaj neblaĵoj abundaj en iliaj verkoj. Kaj kion pensi, kiam ili promesas la fenikson de Arabujo, la kronon de Ariadna, la ĉevalojn de la suno, la perlojn de la sudo, la oron de la rivero Tibro kaj la balzamon de Pancaya? Ĉi-rilate ilia plumo glitas pli senĝene, ĉar ete kostas al ili promesi kion ili nek intencas nek povas doni. Sed kien miaj digresioj min kondukas? Ve al mi, senfortuna! Kia frenezo, aŭ kia absurdo, puŝas min paroli pri la mankoj de aliaj, kiam oni povus tiel multe kritiki pri la miaj? Ve al mi, mizera! Ne la poezio venkis min, sed mia stulto. Ne la muziko, sed mia propra frivolo min delogis. Mia multa nescio kaj mia eta antaŭvido apertis la vojon, taŭgigis la padon al la paŝoj de don Clavijo (tiun nomon havis la menciita kavaliro). Tiel do, dank' al mia perado (ĉar mi kulpas pri la

tuta afero, ne li) li eniris, ne unu, sed multe da fojoj, nomante sin vera edzo en la câmbron de Antonomasia; efektive, kvankam pekantino, mi neniam tolerus, ke sen ĵurpromeso de edziĝo, li tuŝus eĉ la plandon de ŝiaj pantofloj. Tute ne: en ajna tia afero de mi traktata, mi postulas, kiel unuan kondiĉon, ke ĝi baziĝu sur sindevigo de edziĝo. En la kazo de Antonomasia ekzistis komplikoj, nome diferenco de rangoj; don Clavijo estis simple kavaliro, kaj ŝi, kiel dirite, heredulino de la reĝo. Dum kelka tempo ĉi am-intrigo restis kaŝita kaj nekonata, dank' al miaj ruzaj antaŭzorgoj, ĝi ŝajnis al mi, ke tia sekreto baldaŭ diskoniĝus kaŭze de mi ne scias kia ŝveliĝo de la ventro de Antonomasia, ĉe kies stato ni tri, timigite, interkonsiliĝis kaj decidis, ke antaŭ ol la skandalo aperus sub la lumo de la tago, don Clavijo petu antaŭ la vikario la manon de Antonomasia, prezentante skribitan edziniĝo-promeson, kiun la princino faris al li, kaj kiun mi tiele diktis, ke eĉ ne la tuta forto de Ŝimŝon povus ĝin detruiri. Oni faris kiel planite: la vikario legis la promeson, konfesprenis la damon, ĉi lasta faris plenan konfesion, kaj la vikario ordonis, ke oni ŝin tenu sub gardo ĉe tre honorinda urba ĝendarmoj...

—Ankaŭ en Candaya ekzistas urbaj ĝendarmoj, poetoj kaj *seguidillas* —interrompis Sancho—, do mi imagas, kaj povus ĵuri, ke la mondo ĉie samas. Sed, sinjorino Trifaldi, bonvolu pli rapidi; estas tarde, kaj mi mortas de la deziro scii la finon de ĉi longa historio.

—Tion mi faros —respondis la grafino.

[334] «Lupino», «vulpino», kio, en la hispana, signifas ankaŭ «ĉiesulino», «putino».

[335] T.e. kun animo virte matura.

Ĉapitro 39

Kie Trifaldi daŭrigas sian mirigan kaj memorindan historion

Ĉe ĉiu vorto de Sancho, tiom multe amuziĝis la dukino, kiom desperis don Quijote. La hidalgo do ordonis la ŝildiston silenti, kaj Dolorida daŭrigis:

—Nu, post longa enketo, kaj tial, ke la princino persistis en sia decido sen devii eĉ ne unu colon de sia unua deklaro, la vikario verdiktis favore al don Clavijo kaj aljuĝis al li la princinon kiel leĝan edzinon, kio tiel ĉagrenis la reĝinon doña Maguncia, patrinon de Antonomasia, ke, antaŭ ol pasis tri tagoj, ni enterigis ŝin.

—Sendube ŝi mortis —diris Sancho.

—Kompreneble —respondis Trifaldín—. En Candaya oni enterigas, ne la vivajn, sed la mortajn.

—Sed iam kaj tiam okazis, sinjoro ŝildisto —diris Sancho—, ke oni enterigis personon svenintan, pensante, ke li mortis. Kaj ŝajnis al mi, ke reĝino Maguncia devintus, ne morti, sed sveni, ĉar kun la vivo oni aranĝas multe da aferoj, kaj la sinforĝeso de la princino ne gravis ĝis la ekstremo, ke oni sentu tian ĉagrenon pro ŝia konduto. Se ŝi edziniĝus al paĝio aŭ al alia servisto de la domo, kiel multaj puceloj jam faris, la damaĝo ne havus rimedon; sed ŝi edziniĝis al kavaliro bel-aspekta kaj multescia (almenaŭ oni lin pentras tiel) kaj tia edziniĝo povas esti vera stultaĵo, tamen ne tiel granda kiel oni pensus, ĉar, laŭ la principoj de mia mastro (li troviĝas ĉi tie kaj ne dementos min), se el la letruloj oni faras

episkopojn, des pli oni povas fari el la kavaliroj, precipe el la vagantaj, reĝojn kaj imperiestrojn.

—Vi pravas, Sancho —diris don Quijote—. Se vaganta kavaliro havas nur iomete da bona ŝanco, li posedas ĉion necesan por fariĝi baldaŭ la plej potenca senjoro de la mondo. Sed la duenjo Dolorida daŭrigu, ĉar ŝajnas al mi, ke ŝi ne rakontis ankoraŭ la parton amaran de ĉi historio, ĝis nun tiel dolĉa.

—Jes, mankas la parto vere amara —informis la dukino—. Tiel amara ke, kompare kun ĝi, kolocinto dolĉas kaj oleandro bongustas.

—Nu, la reĝino mortis, ne svenis —daŭrigis Trifaldi—, kaj apenaŭ oni enterigis ŝin kaj diris al ŝi la lastan adiaŭ, kiam (*quis talia fando temperet a lacrimis?*)^[336] ĉe la tombo de la reĝino aperis, sur ligna ĉevalo, la giganto Malambruno, kruela sorĉisto kaj kuzo de Maguncia. Kaj por venĝi la morton de sia kuzino, por puni la aŭdacon de don Clavijo kaj por humiligi la insolenton de Antonomasia, li ensorĉis la paron kaj lasis sur la tombo la princinon transformita en bronzan simiion kaj la kavaliro metamorfozita en teruran krokodilon el nekonata metalo. Inter la du figuroj staras kolono same metala, kun siria-lingva enskribo, kiu, tradukita unue en la candayan, kaj nun en la hispanan, diras: «Ĉi du temeraraj geamantoj ne reprenos sian unuan formon ĝis la kuraĝa Manĉano duelos kontraŭ mi: ĉar la fato rezervas ĉi senegalan aventuron nur al lia granda kuraĝo». Farinte la ensorĉon, la giganto elingis larĝan kaj enorman cimitaron, prenis min je la haroj, kaj minace svingis la klingon, kvazaŭ li volus haki al mi la glutilon kaj fortranĉi mian kapon. Mi teruriĝis, timaĉis, kaj mia voĉo gluiĝis al la gorĝo. Tamen mi sukcesis regi min kaj diris tiom da aferoj en tono trema kaj vea al la giganto, ke li forlasis la ideon plenumi tiel rigoran punon. Fine li ordonis, ke oni konduku antaŭ li la duenjojn

de la palaco (jen, vi vidas ilin ĉi tie) kaj post ol li troigis nian kulpon kaj insultis la duenjojn pro ties karaktero, mavaj kutimoj kaj eĉ pli mavaj artifiko, li ŝargis nin per kulpo nur al mi atribuebla, kaj diris, ke, anstataŭ ekzekuti nin, li aplikos al ni punon pli daŭran, ekvivalentan al speco de mizera morto; kaj apenaŭ li finis diri tion, ni sentis, ke la poroj de nia vizaĝo larĝiĝas, kaj ke ĉie sur ĝi doloras pikoj, kvazaŭ ilin farus la pinto de kudriloj. Tuj ni tuŝis nian vizaĝon per la manoj kaj trovis ĝin, kia vi nun vidos.

Tuj poste Dolorida kaj la aliaj duenjoj demetis la vualojn kaj montriĝis kun la vizaĝoj kovritaj de densaj barboj, kelkaj blondaj, kelkaj nigraj, kelkaj blankaj kaj kelkaj duonruĝaj. Tion vidante, la gedukoj ŝajnis surprizon, don Quijote kaj Sancho miris, kaj la ceteraj stuporis. Sed Trifaldi daŭrigis:

—Tiel punis nin la malica kaj misintenca Malambruno, kovrante la glaton kaj morbidon de nia haŭto per la aspro de ĉi krinoj. Kaj ni bedaŭras, ke la ĉielo ne permesis lin fortranĉi nian kapon per sia enorma cimitaro: ĉar tion ni preferus ol vidi kaŝita la lumon de nia vizaĝo sub la nigro de ĉi haroj. Kaj, sinjoroj, se oni pensas bone la aferon (kion mi nun diros, mi volus diri kun la okuloj kiel fontanoj, sed ili verŝis tiom da maroj kaŭze de nia misfortuno, ke ili sekas kaj aridas kiel ostoj, do mi parolos sen plori), kien povus iri duenjo kun barbo? Kiu patro aŭ patrino kompatus ŝin? Kiu helpus ŝin? Se ni apenaŭ trovas ies simpatian, eĉ se ni havas la haŭton glata, torturante nin per mil specoj de kremoj kaj ŝminkoj, kio okazos, kiam oni vidos nin kun vepro sur la vangoj? Ho duenjoj, kunulinoj miaj! En mava horo ni naskiĝis, en mizera momento niaj patroj nin generis!

Kaj, tion dirante, ŝi ŝajnis eksveni.

[[336](#)] Latine: «kiu, aŭdante tion, retenus la ploron?» (Virgilio, *Eneado*, libro 2).

Ĉapitro 40

Pri aferoj rilataj kaj koncernaj al ĉi aventuro kaj al ĉi memorinda historio

Verdire, la ŝatantoj de historioj similaj al la historio de ĉi libro devus montri sin dankaj al Cide Hamete, ĝia unua aŭtoro, tial, ke li zorgis detale rakonti al ni ĉion kaj ne forgesis meti sub la klaran lumon eĉ la plej sensignifan bagatelon. Li priskribas pensojn, rivelas intencojn, respondas ne formulitajn demandojn, klarigas dubojn, solvas objetojn kaj, resume, regalas nin per informoj sufiĉaj por kontentigi la plej scivolan personon de la mondo. Ho, renoma aŭtoro! Ho, feliĉa don Quijote! Ho, fama Dulcinea! Ho, sprita Sancho Panza! Ĉiuj kune, kaj ĉiu aparte, vivu tempon senfinan por la plezuro kaj la ĝenerala amuzo de la homaro.

Diras do la historio, ke, kiam Sancho vidis la duenjon Dolorida sveni, li diris:

—Je mia fido de honesta homo, kaj je la eterna vivo de miaj antaŭuloj, mi ĵuras, ke neniam antaŭe mi aŭdis aŭ vidis, nek mia mastro rakontis al mi, aŭ povus imagi, aventuron tian. Mil demonoj vin prenu, Malambruno, tial, ke vi estas sorĉisto kaj giganto. Ĉu vi ne povis trovi alian specon de puno kontraŭ ĉi pekantinoj ol provizi ilin per barboj? Ĉu ne estus pli bona afero, kaj pli laŭa al ilia stato,^[337] fortranĉi la duonon de ilia nazo, kvankam poste ili parolus kun snufaj sonoj, anstataŭ garni ilin per barboj? Mi vetus, ke ili jam ne havas sufiĉan monon por pagi la servojn de razisto.

—Vi pravas, sinjoro —respondis unu duenjo—. Mono mankas al ni por nia senbarbigo, do kelkaj el ni uzas ekonomian

procedon, nome, apliki al ni sur la vizaĝon algluiĝan plastron kaj poste abrupte ĝin detiri, kio igas nian haŭton nuda kaj glata kiel la fundo de ŝtona pistujo. Ĉar, kvankam en Candaya ekzistas virinoj, kiuj iras de domo al domo por elimini vilon, aranĝi brovojn kaj apliki al la damoj nombro da diversaj ŝmiraĵoj, ni, la duenoj de nia sinjorino, neniam volis akcepti ilin ĉe ni, tial, ke la pliparto jam tro oldaj mem malĉasti, odoras je parigistinoj. Do, se sinjoro don Quijote ne solvos nian problemon, oni entombigos nin barabaj.

—Mi fortondu mian barbon en la lando de la maŭroj^[338] — diris don Quijote—, se mi ne liberigos vin de la viaj.

Ĉi-momente Trifaldi vekigis el sia sveno kaj diris:

—La tinto de via promeso, kuraĝa kavaliro, sonis en miaj oreloj, meze de mia sinkopo, kaj helpis min reakiri la konscion kaj la tuton de miaj sensoj; do, denove mi suplikas vin, renoma sinjoro vaganta kaj nevenkebla, plenumi vian bonvolan promeson.

—Ne dubu pri tio —respondis don Quijote—. Diru, sinjorino, kion mi devas fari. Mi pretas servi vin kun mia tuta kuraĝo.

—La afero estas —diris Dolorida—, ke, se oni iras surtere, la regno de Candaya distancas de ĉi tie dek kvin mil mejlojn, plus aŭ minus ses mejlojn. Sed, se oni iras rekte tra la aero, ĝi distancas naŭ mil ses cent okdek unu. Sciu ankaŭ, ke Malambruno informis min, ke, se bonŝance mi renkontus la kavaliron pretan liberigi nin, li sendus al li ĉevalon multe pli bonan kaj malpli miskondutan ol la luaj rajdbestoj, ĉar temus pri la sama ĉevalo, sur kies dorso, la kuraĝa Pierres, kaptinte la lindan Magalona, kunportis ŝin. Oni direktas kaj bremsas la ĉevalon per ligna najlo en ĝia frunto, kaj ĝi flugas tra la aero tiel rapide, ke ŝajnas, ke la diabloj mem ĝin movas. Laŭ olda tradicio, la sorĉisto Merlín konstruis ĉi

ĉevalon kaj ĝin pruntis al sia amiko Pierres, kiu faris per ĝi longajn vojaĝojn, kaj, kiel dirite, forkaptis la lindan Magalona kaj, tra la aero, portis ŝin sur ĝia grupo, dum, de sur la tero, la rigardantoj algapis ilin kiel stultuloj. Merlín ordinare pruntis la ĉevalon nur al siaj bonaj amikoj aŭ al la personoj, kiuj pagis al li plej multe. Laŭ nia scio, de la epoko de la granda Pierres oni ne plu rajdis la ĉevalon, sed Malambruno proprigis ĝin al si per siaj artifiko kaj nun vojaĝas per ĝi ofte kaj tra la tuta mondo: hodiaŭ li troviĝas ĉi tie, morgaŭ en Francujo, postmorgaŭ en Potosí; kaj la plej bona afero estas, ke ĉi ĉevalo nek manĝas, nek dormas, nek bezonas hufumojn, kaj sen flugiloj trovas tiel glite kaj egalpaŝe tra la aero, ke ĝia rajdanto povus porti en la mano glason plenan de akvo, sen ke verŝiĝus eĉ unu sola guteto; tial, rajdadi sur ĝi tre plaĉis al la lina Magalona.

—Por iri glite kaj egalpaŝe mi preferas mian azenon — interrompis Sancho—. Vere, ĝi ne flugas tra la aero, sed sur la tero mi privetus ĝin kontraŭ ĉiaj trotuloj de la mondo.

Ĉiuj ridis, kaj Dolorida daŭrigis:

—Kaj ĉi ĉevalo (se Malambruno efektive deziras meti finon al nia misfortuno) troviĝos ĉi tie antaŭ ol pasos duonhoro post la noktiĝo; ĉar li informis min, ke se mi renkontus la ĝustan kavaliron, li sendus al mi tuj kaj rapide la ĉevalon.

—Kiom da personoj povas rajdi ĝin? —demandis Sancho.

—Du —respondis Dolorida—. Unu sur la selo kaj la alia sur la grupo; kaj ordinare, rajdas ĝin kavaliro kaj ŝildisto, kiam mankas forkaptita pucelo.

—Mi volus scii la nomon de la ĉevalo, sinjorino Dolorida — diris Sancho.

—Ĝi nomiĝas nek Pegaso, kiel la ĉevalo de Belerofono, nek Bucefalo, kiel tiu de Aleksandro la Granda, nek Briladoro, kiel tiu de Rolando la freneza, nek, malpli ankoraŭ, Bajardo, kiel tiu de Reinaldos de Montalbán, nek Frontino, kiel tiu de Rugero, nek Bootes, nek Peritoa, kiel laŭdire nomiĝis la ĉevaloj de la suno;^[339] ĝi ankaŭ ne nomiĝas Orelia, kiel la ĉevalo rajdata de la senfortuna Rodrigo, lasta reĝo de la gotoj, kiam li partoprenis en la batalo, kie li perdis la kronon kaj la vivon.

—Mi vetus —diris Sancho—, ke tial, ke oni ne donis al ĝi la nomon de unu el ĉi famaj ĉevaloj, ĝi ankaŭ ne ricevis la nomon de la ĉevalo de mia mastro, Rocinante, kiu, se consideri nur la konvenecon de la nomoj, superas la ceterajn ĉevalojn.^[340]

—Vi pravas —respondis la barba grafino—. Tamen, ankaŭ la ligna ĉevalo havas konvenan nomon: Clavileño la fluganta, aludan al tio, ke la ĉevalo havas najlon en la frunto, estas ligna^[341] kaj vojaĝas plej rapide. Do, rilate al la nomo, Clavileño povas rivali kun la fama Rocinante.

—Ĝi havas sufiĉe plaĉan nomon —diris Sancho—. Sed, per kia brido aŭ rimeno oni ĝin direktas?

—Mi jam diris al vi: per la najlo —respondis Trifaldi—. Turnante la najlon en unu aŭ alia direkto, la rajdanto povas iri jen alte tra la aero, jen preskaŭ tuŝante la teron, jen tenante sin en la mezo, kio lasta konvenas, kiam oni deziras entrepreni bonorde ajnan aferon.

—Mi dezirus vidi tian ĉevalon —diris Sancho—. Sed pensi, ke mi rajdos ĝin sur la selo aŭ sur la grupo, egalus peti de ulmo pirojn. Mi apenaŭ povas teni min sur la ŝarĝo-selo, pli mola ol silko, de la azeno, kaj nun oni volas, ke mi rajdu sur grupo ligna, sen ia kuseno aŭ kuseneto. Je Dio, mi ne havas la

intencon mueli min, por ke alies barbo malaperu. Ĉiu razu sin laŭpove, ĉar mi ne akompanos mian mastron en tiel longa vojaĝo. Des pli, ke min koncernas nur la elsorĉo de mia sinjorino Dulcinea, ne la razo de ĉi barboj.

—Vi eraras, amiko —respondis Trifaldi—. Mi scias, ke oni nepre bezonas vin, tiom, ke, sen vi, nenio estus farebla.

—Kia absurdo! —ekkriis Sancho—. Kion komunan havas la ŝildistoj kun la aventuroj de siaj mastroj? Ĉu ili akapararu la gloron, kiam ili sukcesas en siaj entreprenoj, kaj ni elportu la ŝarĝon kaj la batojn? Ho ve! Se almenaŭ la historiistoj dirus: «Ĉi kavaliro plenumis tian aŭ tian aventuron, sed kun la helpo de sia ŝildisto Ajnulo, sen kies interveno la aventuro ne havus feliĉan finon». Sed, anstataŭe, ili simple skribas: «Don Paralipomeno de la Tri Steloj finis la aventuron de la ses monstroj» kaj ne mencias lian ŝildiston, kvazaŭ li ne ekzistus en la mondo, kvankam li staris ĉiam ĉe la flanko de sia sinjoro. Mi ripetas, ke de mia mastro iru sola, kaj ke tio faru al li bonon. Mi restos ĉi tie, en la kompanio de mia sinjorino la dukino, kaj, kiam li revenos, eble li trovos la aferon de sinjorino Dulcinea en pli kontentiga stato, ĉar mi intencas en miaj momentoj de neniofarado kaj ripozo doni al mi tian serion da vipobatoj, ke eĉ ne unu haro restos sur la batita parto.

—Tamen, bona Sancho, vi akompanos lin, se necese —diris la dukino—, ĉar tion suplikas al vi honestaj personoj; kaj la vizaĝoj de ĉi damoj ne devus plu suferi la barbon pro via vana timo. Estus hontinde.

—Kia absurdo, vere! —respondis Sancho—. Se tian bonfaron oni plenumus favore al modesta pucelo aŭ orfino, oni povus riski sin; sed ŝarĝi sin per zorgoj kaj klopodoj por senbarbigi duenjon... ne, je la diablo! Prefere vidi ilin kun barbo, de la plej alta ĝis la plej nana, de la plej afekta ĝis la plej ridinda!

—Basan opinion vi havas pri la duenjoj, amiko Sancho —diris la dukino—. Vi pensas preskaŭ same kiel la apotekisto de Toledo. Sed vere, vi ne pravas. En mia domo vivas duenjoj modelaj; por ekzemplo, jen doña Rodríguez: ŝi ne dementos min.

—Absolute ne, Via Ekscelenco! —respondis doña Rodríguez—. Dio konas la veron de ĉio. Ankaŭ ni, la duenjoj, bonaj aŭ mavaj, barbaj aŭ senbarbaj, havis patrinon kiel la ceteraj virinoj, kaj, se Dio enmondigis nin, Li certe scias, kial Li tion faris. Do mi konfidas lin mizerikordon, ne ies barbon.

—Nu, bone, sinjorino Rodríguez —interrompis don Quijote—, kaj vi, doña Trifaldi kaj kompanio, mi esperas, ke la ĉielo rigardos kun favoraj okuloj vian misfortunon; ke Sancho faros kion mi ordonos; ke venos Clavileño, kaj ke mi frontos Malambrunon: ĉar mi scias, ke nenia razilo senbarbigus pli facile viajn moŝtojn, ol mia glavo fortranĉus la kapon de Malambruno de sur ties ŝultroj. Ja Dio toleras la perversajn, sed ne por ĉiam.

—Ha! —ekkriis Dolorida—. La steloj de la ĉielaj regionoj kontemplu kun bonvolaj okuloj vian grandecon, sentima kavaliro, kaj donu al via kuraĝo la firmon kaj forton sufiĉan, por ke ĝi estu ŝildo kaj protekto de la mistraktata kaj insultata raso de duenjoj kontraŭ malicoj de apotekistoj, klaĉoj de ŝildistoj kaj friponaĵoj de paĝioj. La diablo prenu la kompatindulinon, kiu en la floro de sia aĝo decidus fariĝi duenjo prefere ol monaĥino! Ve al ni, duenjoj! Kvankam ni devenas de Hektoro la trojano laŭ direkta linio vira, niaj mastrinoj ne ĉesas trakti nin disdegne kaj superece, se per tio ili kredas sin reĝinoj. Ho, giganto Malambruno: kvankam sorĉisto, vi ĉiam plenumas viajn promesojn! Sendu al ni do la senegalan Clavileño, por ke nia misfortuno finiĝu: ĉar se la varmo de la sezono trafos nin ankoraŭ kun ĉi barboj, ve al ni kaj al nia espero!

Trifaldi diris tion kun tiel granda patoso, ke ĉies okuloj komencis plori. Sancho mem dronis en larmoj kaj decidis en sia koro akompani sian mastron ĝis la fino de la mondo, se tio necesus por faligi la lanon de la vangoj de tiel respektindaj vizaĝoj.

[337] Sarkasmo de Sancho. La duenjoj, laŭfame, tro scivolis pri la vivo de la ceteraj personoj kaj ege ŝatis meti la nazon en fremdan vazon. Tial, Sancho preferas ilin sennazaj.

[338] La araboj ĉiam portis barbon kaj opiniis nedignaj kaj senhonoraj la virojn, kiuj razis sin.

[339] Dolorida intence kaj humure konfuzas iliajn nomojn. La ĉevaloj tirintaj la sunon nomiĝis Eoo kaj Piroento. Bootes (aŭ Bovisto) estas boreala konstelacio proksima al la Granda Ursino. Peritoa (aŭ Peritoo) estis amiko de Tezeo.

[340] Por bone kompreni ĉi ironion de Sancho, oni memoru, ke Rocinante signifas «ĉevalaĉo».

[341] Najlo en la hispana estas «clavo»; ligno, «leño»; kaj, «i»; do Clav-i-leño.

Ĉapitro 41

Pri la alveno de Clavileño, kun la fino de ĉi longa aventuro

Fine alvenis la nokto kaj, kun ĝi, la horo, kiam devus aperi la fama ĉevalo Clavileño, ĉe kies prokrasto don Quijote jam komencis nervoziĝi, ĉar ŝajnis al li, ke Malambruno ne sendas ĝin, tial, ke li ne estas la ĝusta kavaliro por ĉi aventuro, aŭ tial, ke la giganto ne kuraĝas dueli kontraŭ li.

Sed tiam, neatendite, kvar sovaĝuloj kun la korpo kovrita per verda hedero eniris en la ĝardenon, portante ŝultre ĉevalon lignan. Ili metis ĝin sur la teron, kaj unu sovaĝulo diris:

—La kavaliro havanta la sufiĉan kuraĝon suriru ĉi maŝinon.

—Nu, bone —interrompis Sancho—. Mi ne suriros, ĉar mi nek estas kavaliro, nek havas kuraĝon.

Sed la sovaĝa daŭrigis:

—Kaj, se li havas ŝildiston, ĉi lasta rajdu sur la grupo kaj fidu la kuraĝan Malambruno, ĉar nur ties glavon, li devus timi. Nek la glavo nek la malico de aliaj personojn ofendos lin. Oni nur movu ĉi najlon en la frunto de la ĉevalo, kaj Clavileño portos vin tra la aeron ĝis la loko, kie Malambruno atendas. Sed, por ke la grandega alto kaj impono de la flugo ne kaŭzu kapturon, oni devas iri kun la okuloj kovritaj, ĝis la ĉevalo heno, ĉar la heno indikos la finon de la vojaĝo.

Tion dirinte, ili lasis tie Clavileñon, kaj kun gracia teniĝo retiris sin en la direkto, de kie ili antaŭe venis.

Dolorida, tuj kiam ŝi vidis la ĉevalon, diris preskaŭ plorante al don Quijote:

—Kuraĝa kavaliro, la promesoj de Malambruno efektiviĝis; la ĉevalo staras ĉi tie, kaj niaj barboj kreskas. Je la nomo de ĉiu el ni, kaj je la nomo de ĉiu haro de niaj barboj, ni suplikas vin, ke vi nin razu kaj tondu, kion vi atingos nur grimpante kun via ŝildisto la ĉevalon kaj feliĉe komencante vian novan vojaĝon.

—Tiom mi faros, sinjorino grafino Trifaldi, volonte kaj senhezite, kaj por ne prokrasti la entreprenon, mi nek serĉos kusenon, nek metos al mi spronojn. Konsideru do, kiom mi deziras vidi vin, sinjorino, kaj ceterajn duenojn, nudavangaj kaj senbarbaj.

—Tion mi faros, nek vole aŭ nevole, nek iel ajn —diris Sancho—. Kaj se oni ne povas efektiviĝi la razadon, sen ke mi suriru la gropon, mia mastro traktu, ke alia ŝildisto lin akompanu, kaj ĉi damoj klopodu trovi novan senbarbigan metodon, ĉar mi ne estas sorĉisto, kaj ne ŝatas iri tra la aero. Kion dirus miaj insulanoj, se ili sciis, ke ilia gubernatoro flugas promene inter la nuboj? Kaj jen alia afero: Candaya distancas de ĉi tie proksimume naŭ mil mejlojn, kaj se la ĉevalo laciĝus, aŭ la giganto mishumorus, la revena vojaĝo daŭrus ses jarojn, kaj tiam ne ekzistus en la mondo insuloj aŭ insulanoj kapablaj rekoni min. Nu, tial, ke laŭdire, «se oni prokrastas la aferojn oni endanĝeriĝas» kaj «ĉe propono de ringo, prezentu la fingron», la barboj de ĉi sinjorinoj pardonu, sed bone sidas Sankta Petro en Romo; mi volas diri, ke mi sentas min tre bone en ĉi domo, kie oni traktas min kun tiom da afablo, kaj de kies mastro mi esperas, ke li favoru min per la gubernatoreco.

—Amiko Sancho —respondis la duko—. La insulo, kiun mi promesis al vi, estas nek movebla nek fuĝema kaj havas

radikon tiel profundan, fiksitan en la abismo de la tero, ke oni ne deskuus aŭ delokus la insulon eĉ per tri fortaj ekpuŝoj. Kaj ĉar, kiel vi scias, kaj mi scias, la gravajn postenojn oni vendas por unu prezo aŭ alia, mi volas ricevi por ĉi gubernatoreco, kiel pagon, ke vi akompanu vian sinjoron don Quijote plenumi kaj fini ĉi memorindan aventuron. Indiferente al tio, ĉu vi tuj revenos sur Clavileño, kiel ĝia rapido promesas, aŭ kontraŭa sorto igos vin reveni piede, kiel pilgrimanto, de taverno en tavernon kaj gastejo en gastejon, ĉiuokaze vi trovos ĉe via alveno la insulon en la sama loko, kie ĝi nun kuŝas, viaj insulanoj sentos ĉiam la saman deziron vidi vin gubernatoro, kaj krome nenio ŝancelos mian bonvolon por vi. Kaj ne dubu kion mi diras; alie vi farus evidentan ofendon al mia deziro servi vin.

—Ne plu parolu, sinjoro —diris Sancho—. Mi estas ia povra ŝildisto kaj ne povas ne cedi antaŭ tiom da favoroj. Mia mastro grimpu, oni kovru al mi la okulojn kaj rekomendu min al Dio. Kaj mi volus scii, ĉu, kiam ni flugos alte, mi povos rekomendi min al Nia Sinjoro, aŭ alvoki la anĝelojn, ke ili min helpu.

—Sancho —respondis Trifaldi—. Laŭvole rekomendu vin al Dio aŭ al iu ajn alia: ĉar Malambruno, kvankam sorĉisto, estas kristano kaj faras siajn ensorĉojn kun granda sagaco kaj prudento, sen altrudi sin al ajna persono.

—Nu, bone —diris Sancho—. Helpu min Dio kaj la Sankta Triunuo de Gaeta.

—Depost la memorinda aventuro de la ful-marteloj —diris don Quijote—, neniam mi vidis Sanchon tiel timigita kiel nun, kaj, se mi superstiĉus kiel aliaj, lia timemo povus kaŭzi kelkan ekstremon al mia koro. Sed venu ĉi tien, Sancho, ĉar, kun permeso de ĉi sinjoroj, mi volas diri al vi du tri vortojn private.

Kaj irinte kun Sancho post kelkaj arbojn de la ĝardeno, la hidalgo prenis liajn du manojn kaj daŭrigis:

—Jam vi vidas, frato Sancho, ke nin atendas longa vojaĝo. Nur Dio scias kiam ni revenos, kaj ĉu niaj aferoj permesos al ni ajnan ripozon aŭ tempon libere disponeblan. Tial do mi deziras, ke vi iru nun al via ĉambro, pretekstante, ke vi iras preni ion necesan por la vojaĝo, kaj ke, en unu momento, vi donu al vi almenaŭ cent vipobatojn partopage de la tri mil tricent ŝuldataj. Oni kreditos ilin en vian konton, kaj, krome, «afero komencita jam duone finita».

—Je Dio —respondis Sancho—. Sendube mankas klapo al la kapo de via moŝto. Al via peto aplikeblas la proverbo: «Vi vidas, ke nun mi devas forrapidi, kaj ĝuste nun vi volas min deflori». Ĉu via moŝto deziras, ke mi batu al mi la pugon nun, kiam mi devos sidi sur nuda tabulo? Vere kaj sincere, via moŝto ne pravas. Ni entreprenu nun la razadon de ĉi duenjoj, kaj, kiam ni revenos, mi promesas, je mia honoro, ke mi tiel rapide kvitiĝos de mia ŝuldo, ke via moŝto sentos sin kontenta. Kaj punkto.

—Nu, bona Sancho, via promeso konsolas min —respondis don Quijote—, kaj mi kredas, ke vi plenumos ĝin; ĉar, kvankam stulta, vi estas ankaŭ sincera kaj verdira.

—Mi ne estas verda, sed bruna —diris Sancho—. Sed, eĉ se mi estus miksaĵo de koloroj, mi same tenus mian parolon.

Poste ili iris al Clavileño, don Quijote pretis suriri la lignan ĉevalon kaj diris al Sancho:

—Bendu al vi la okulojn, Sancho, kaj surpriru, ĉar, kiu sendis voki nin de tiel foraj landoj, certe ne havas la intencon nin perfidi, se konsideri, ke li akirus nenian gloron malicante kontraŭ la persono, kiu konfidas lin. Kaj, eĉ se ĉio okazus

male ol mi imagas, nenia fiaĵo povos vuali la floron
entrepreni ĉi aventuron.

—Ni ekiru jam, sinjoro —diris Sancho—. La barboj kaj la
larmoj de ĉi sinjoroj torturas al mi la koron, kaj eĉ ne unu
plenbuŝon mi manĝos trankvile, ĝis mi vidos ilian vizaĝon
glatan kiel antaŭe. Via moŝto bendu al vi la okulojn kaj
surĉevaliĝu unua, ĉar, se mi devas sidi sur la gropo,
evidentas, ke unue devas grimpi la rajdonto sur la selo.

—Vi pravas —diris don Quijote.

Li elprenis naztukon el sia poŝo kaj petis Doloridan bone
bendi liajn okulojn. Tion ŝi faris, sed don Quijote detiris la
bendon kaj diris:

—Se mi bone memoras, mi legis ĉe Vergilio la epizodon pri la
Paladio de Trojo, t.e. pri la ligna ĉevalo, graveda je armitaj
kavaliroj, kiun la grekoj prezentis al la diino Palasa. Poste, ĉi
kavaliroj kaŭzis la plenan ruinon de Trojo, do konvenus
esplori, ĉu Clavileño portas ion en sia stomako.

—Ne necesas —diris Dolorida—. Mi konfidas je Malambruno,
kaj scias, ke li kapablas fari nenion malica aŭ perfidan. Via
moŝto, sinjoro don Quijote, surĉevaliĝu sen ia zorgo, kaj, se
mavo falos sur vin, mi ĝin ricevu.

Ŝajnas al don Quijote, ke, se li insistus koncerne sian
personan sekurecon, oni komencus dubi pri lia kuraĝo, do li
senreplike surpris Clavileñon kaj provis per la fingroj la
facile turneblan najlon. Kaj tial, ke li ne havis piedingojn, kaj
liaj kruroj pendis, li similis pentritan aŭ teksitan figuron de
flandra tapiŝo prezentanta Romanan triumfon.^[342] Ankaŭ
Sancho, iom post iom kaj malgraŭvole, grimpis kaj aranĝis
laŭpove sur la gropo; sed li trovis ĝin iom dura kaj tute ne
komforta, do li demandis al la duko, ĉu oni ne povus alporti

al li unu kusenon, eĉ se ĝi apartenus al la *estrado* de lia sinjorino la dukino aŭ al la lito de ajna paĝio: ĉar, li aldonis, la grupo de Clavileño ŝajnas pli marmora ol ligna. Trifaldi respondis, ke la ĉevalo toleras sur si neniam harnison aŭ garnon, kaj ke li povus rajdi virinmaniere,^[343] por ne tiel forte senti la duron de la ligno. Sancho tion faris kaj, dirante adiaŭ, lasis, ke oni bendu liajn okulojn.

Tamen, jam kun la okuloj kovritaj, li detiris la bendon kaj rigardante mole kaj kun larmoj la personojn de la ĝardeno, suplikis, ke ili helpu lin en lia danĝera situacio, preĝante unu *avemaría*, por ke Dio havigu al ili aliajn propetantojn, se ili vidus sin en simila embaraso.

—Fripono! —diris tiam don Quijote—. Kial vi petas preĝojn? Ĉu eble vi estas alligita al pendingo aŭ troviĝas en la lasta momento de via vivo? Mizera poltrono, ĉu vi ne sidas sur la sama loko de la linda Magalona, de kie ŝi descendis, ne en la tombon, sed por levi sin, kiel reĝino, al la trono de Francujo, se la historio ne mensogas? Kaj mi, rajde apud vi, ĉu mi ne povas min kompari kun la kuraĝa Pierres, kiu okupis ĉi saman lokon mian? Kovru al vi la okulojn, bonvolu, kaj almenaŭ en mia ĉeesto, ne montru per paroloj la timon de via koro.

—Oni min bendu —respondis Sancho—, kaj tial, ke oni volas, ke nek mi, nek la aliaj, rekomendu min al Dio, ĉu estas surprize, ke mi timas renkonti ie ajn unu legion da demonoj, kiu povus konduki nin al Peralvillo?^[344]

Jam okulbendita, don Quijote opiniis, ke ĉio estas en ordo kaj tuŝis la najlon; kaj apenaŭ li metis la fingrojn sur ĝin, kiam la duenjoj kaj la ceteraj ĉeestantoj levis la voĉon, dirante:

—Dio gvidu vin, kuraĝa kavaliro! Dio vin akompanu, sentima ŝildisto! Vi iras jam tra la aero kaj ĝin fendas kun la rapido

de sago! Jam oni rigardas vin de sur la tero kun miro kaj admiro! Tenu vin firme, kuraĝa Sancho, ne ŝanceliĝu! Zorgu ne perdi la ekvilibron, ĉar via falo estus pli danĝera ol la falo de la temerara junulo, kiun volis direkti la ĉaron de sia patro la suno.^[345]

Sancho aŭdis la voĉojn, alpremis sin al sia mastro, kun la brakoj ĉirkaŭ li, kaj demandis:

—Sinjoro, kial ili krias, ke ni flugas alte, se iliaj voĉoj ŝajnas paroli ĉe nia flanko?

—Ne atentu tion, Sancho. Ĉi speco de flugoj staras ekster la ordinara iro de la aferoj, do de la distanco de mil mejloj vi povus vidi kaj aŭdi ion ajn. Sed ne tiom alpremu vin al mi. Verdire, mi ne scias, kio vin perturbas kaj alarmas, ĉar mi ĵurus ke en mia tuta vivo neniam mi rajdis ĉevalon de tiel egala paŝado, tiom, ke ŝajnas, kvazaŭ ĝi ne moviĝus de la sama loko. Forĵetu do vian timon, amiko; vere, ĉi afero iras normale, kaj la vento venas deposte.

—Vi pravas —respondis Sancho—, ĉar de tie min frapas fortega vento, kvazaŭ oni elĵetus aeron per mil bloviloj.

Kaj tio efektive okazis: per kelkaj grandaj bloviloj oni donis al ili aeron. Tiel perfekte planis ĉi aventuron la gedukoj kaj la majordomo, ke nenia detalo mankis al ĝi.

Sentante la blovadon, don Quijote diris:

—Sendube, Sancho, ni jam alvenas al la dua regiono de la ĉielo, kie originas la hajlo kaj la neĝo. La tondroj kaj la fulmoj originas en la tria regiono. Kaj se ni plu supriros ĉi-maniere, baldaŭ ni atingos la regionon de la fajro, kaj mi ne scias, kiel manipuli ĉi najlon por eviti ascendi tro alten kaj bruli.

Tiam, per flamaj pecoj el stupo, alligitaj al la ekstremo de longaj kanoj, oni komencis varmigi ilian vizaĝon. Sancho sentis la varmon kaj diris:

—Mi mortu, se ni ne eniris jam en la lokon de la fajro, aŭ se ni ne troviĝas proksime, ĉar mi ne havas rostita la duonon de la barbo. Kaj mi dezirus detiri mian bendon por vidi, kie ni flugas.

—Ne faru tion —respondis don Quijote—. Memoru la aŭtentan historion de doktoro Torralva, kiun, kun la okuloj fermitaj kaj rajde sur kano, la diabloj transportis tra la aero. En dek du horoj li atingis Romon kaj descendis sur la straton Torre de Nona, vidis la teruran atakon kontraŭ la urbon kaj la morton de Borbón,^[346] kaj, en la mateno, la doktoro jam troviĝis returne en Madrid, kie li informis pri ĉio kion li vidis en Romo. Li diris ankaŭ, ke, irante tra la aero, li apertis la okulojn, ordonite de la diablo, kaj vidis sin, laŭŝajne, tiel proksima al la korpo de la luno, ke li povus tuŝi ĝin per la mano, kaj li ne kuraĝis rigardi al la tero por ne sveni. Sekve, Sancho, ni ne bezonas detiri la bendon de la okuloj, ĉar, la homo respondeca pri ni, devas dece nin trakti, kaj eble nun ni soras ĝis la plej alta punkto por fali subite sur la regnon de Candaya, same kiel faras la falkoj, kiam ili ascendas plej alten por ĵeti sin kontraŭ la ardeoj. Kaj, kvankam laŭŝajne ni ekflugis de la ĝardeno antaŭ duonhoru, estu certa, ke ni jam iris tre longan distancon.

—Mi ne scias —diris Sancho—. Sed mi povas aserti, ke se sinjorino Magallanes aŭ Magalona trovis komforta ĉi gropon, certe ŝi ne havis tre delikatan haŭton.

La gedukoj kaj ceteraj personoj en la ĝardeno aŭskultis ĉi konversacion de la du herooj kaj ege amuziĝis je iliaj komentoj. Kaj dezirante meti finon al ĉi stranga kaj bele kombinita aventuro, ili ekbruligis per iom da stupo la voston

de Clavileño, kies interno plenis de petardoj, kaj subite la ĉevalo eksplodis en la aeron meze de terura bruo, kaj don Quijote kaj Sancho, duonrostitaj, falis sur la teron.

Iom pli frue la tuta eskadrono da duenjoj, eĉ Trifaldi, forlasis la ĝardenon, kaj la ceteraj personoj kuŝis surtere, kvazaŭ svenintaj. don Quijote kaj Sancho, trabatitaj, stariĝis, rigardis ĉien kaj stuporis, vidante sin en la sama ĝardeno, de kie ili ekflugis, kaj meze de tiom da homoj kuŝantaj. Sed ilia miro eĉ pli intensiĝis, kiam ili vidis longan lancon fiksitan en la tero, flanke de la ĝardeno, kaj de kies ekstremo, pere de du ŝnuretoj el verda silko, pendis pergameno kun la jena teksto en grandaj literoj oraj:

La fama kavaliro don Quijote de La Mancha entreprenis kaj finis la aventuron de grafino Trifaldi, alinome duenjo Dolorida, kaj kompanio, per nur sia intenco ĝin plenumi. Malambruno konsideras sin plene kontenta. La mentonoj de la duenjoj jam vidiĝas glataj kaj nudaj, kaj la gereĝoj Clavijo kaj Antonomasia reprenis sian unuan aspekton. Kaj kiam la ŝildista skurĝado plenumiĝos ĝisfine, la blanka kolombino ĉesos esti viktimo de la fetoraj falkoj ŝin persekutantaj kaj falos en la brakojn de sia kverema turto. Tion ordonas Merlín, la saĝa protosorĉisto.

Leginte la tekston de la pergameno, don Quijote komprenis, ke ĝi aludas la elsorĉon de Dulcinea. Li dankis la ĉielon, ke li senriske finis ĉi grandan aventuron redoni la iaman haŭton nudan al la vizaĝo de la respektindaj duenjoj, ne plu videblaj, iris al la loko, kie la gedukoj kuŝis, ankoraŭ senkonsciaj, prenis la manon de la duko kaj diris:

—Nu, sinjoro, kuraĝon. Kuraĝon, ĉar nenio okazas. La aventuro finiĝis kaj neniu suferis nocon, kiel klare montras la skribaĵo pendanta de la lanco tie.

La duko, kvazaŭ li vekigus el peza dormo, rekonsciiĝis iom post iom, kaj same faris la dukino kaj la ceteraj personoj kuŝantaj tra la ĝardeno. Li elmontris tiom da miro kaj stuporo, ke oni povus kredi vera kion ili ŝerce simulis.

La duko legis kun duonfermitaj okuloj la pergamenon kaj tuj poste, kun apertaj brakoj, iris ĉirkaŭpreni la hidalgon, dirante al li, ke li estas la plej brava kavaliro de ĉiuj epokoj. Dume Sancho ĉien rigardis kun la deziro renkonti la duenjon Dolorida, por vidi, kian vizaĝon ŝi havus sen la barbo, kaj ĉu ŝi belus sen ĝi tiom multe, kiom ŝia gracia figuro promesis. Sed oni diris al li, ke tuj kiam Clavileño descendis, brulante, tra la aero kaj atingis la teron, la tuta eskadro da duenoj malaperis kun Trifaldi, sed jam razitaj kaj sen siaj hirtaj barboj. La dukino demandis al Sancho, kie li fartis en si longa vojaĝo, kaj la ŝildisto respondis:

—Mi sentis min fluganta en la regiono de la fajro, kiel mia mastro diris, sinjorino. Tiam mi volis iom deŝovi la bendon de miaj okuloj por rigardi, kaj petis de li lian permeson fari tion, sed li ne konsentis. Tamen, pro tio, ke min piketas la scivolo kaj la deziro koni kion al mi oni prohibas aŭ kaŝas, mi senplie kaj nevidante deŝovis iomete la bendon apud la nazo kaj tiel povis rigardi al la tero, ne pli granda ol sinapa semeto, dum la homoj sur ĝi ŝajnis iom pli grandaj ol aveloj: imagu kiom alte ni flugis tiam.

—Amiko Sancho —respondis la dukino—, pensu kion vi diras, ĉar, ŝajne, vi vidis, ne la teron, sed la homojn sur ĝi. Evidentas, ke se la tero montriĝus al vi kiel sinapa semeto, kaj ĉiu viro kiel avelo, unu sola homo kovrus la tutan teron.

—Vi pravas —diris Sancho—. Tamen la teron mi vidis okulangle kaj vidis ĝin tuta.

—Pensu, Sancho —respondis la dukino—, ke okulangule oni ne plene vidas kion oni rigardas.

—Pri tiaj rigardoj mi scias nenion —diris la ŝildisto—. Mi scias nur, ke eble konvenas, ke via moŝto ne forgesu, ke ni flugis per sorĉ-arto kaj ke, sekve, per sorĉ-arto mi povis vidi la tutan teron kaj ties tutan loĝantaron, kiel ajn mi rigardis. Kaj se via moŝto ne kredas tion, vi ne kredos ankaŭ, ke, iom deŝovinte la bendon de la brovoj, mi vidis min tiel proksima al la ĉielo, ke mi apenaŭ distancis de ĝi unu spanon kaj duonon, kaj mi povas ĵuri, sinjorino, ke ĝi estas vere granda. Kaj okazis, ke ni tiam flugadis tra la loko, kie sidas la sep kapridinoj^[347] kaj, je Dio kaj je mia animo, tiel baldaŭ kiel mi vidis ilin, mi sentis la deziron iom ludi kun ili, se konsideri ke, en mia lando, mi estis paŝtisto de kaproj en mia infanaĝo. Kaj se mi ne kontentigus tian deziron, mi pensas, ke mi krevintus. Tiel do, kion fari? Nu, parolante al neniuj, eĉ ne al mia mastro, mi senplie deĉevaliĝis en silento kaj ludis preskaŭ tri kvaronojn de horo kun kapridinoj, belaj kiel levkoj. Kaj dume Clavileño nek movis sin, nek iris antaŭen.

—Kaj dum la bona Sancho distris sin kun la kapridinoj, per kio sin distris sinjoro don Quijote? —demandis la duko.

—Tial, ke ĉi aferoj kaj eventoj okazas ekster la natura ordo —respondis la hidalgo—, ne estas surprize, ke Sancho diras kion li diras. Rilate al mi, mi povas aserti, ke mi ne deŝovis mian bendon, nek suben, nek supren, nek vidis la ĉielon la maron aŭ la dezertojn. Verdire, mi sentis kiam ni pasis la regionon de la aero, kaj eĉ kiam ni tuŝis la regionon de la fajro, sed mi ne kredas, ke ni pasis pretere, ĉar, tial, ke la regiono de la fajro situas inter la ĉielo de la luno kaj la lasta regiono de la aero, ni ne povus atingi la ĉielon, kie troviĝas la sep kapridinoj menciitaj de Sancho, sen esti konsumitaj de la fajro. Kaj pro tio, ke ni ne brulis, aŭ Sancho mensogas, aŭ Sancho sonĝas.

—Mi nek mensogas nek sonĝas —protestis la ŝildisto—. Demandu al mi pri la aspekto de la kapridinoj, kaj tiam vi vidos, ĉu mi diras la veron aŭ ne.

—Priskribu ilin do, Sancho —petis la dukino.

—Du estas verdaj, du ruĝaj, du bluaj kaj unu bunta.

—Stranga speco de kaprinoj —diris la duko—. En nia regiono de la tero, ne troveblas tiaj koloroj, mi volas diri, kaprinoj de tiaj koloroj.

—Oni facile komprenas tion —respondis Sancho—. Devas ekzisti diferenco inter la kaprinoj ĉielaj kaj teraj, ĉu ne?

—Diru Sancho —demandis la duko—. Ĉu vi vidis ian kapron inter la kaprinoj?^[348]

—Ne, sinjoro —respondis Sancho—. Sed mi aŭdis diri, ke neniu portas kornojn pli grandajn ol la kornoj de la luno.

Oni ne plu volis demandi la ŝildiston pri lia vojaĝo, ĉar li ŝajnis preta image vagadi tra ĉiuj ĉielo kaj fari plenan raporton pri ĉio tie troviĝanta, kvankam li ne moviĝis de la ĝardeno.

Tiel finiĝis la aventuro de la duenjo Dolorida. Ĝi ege amuzis la gedukojn, ne nur en ĉi momento, sed dum ilia tuta vivo, kaj donis al Sancho temon de konversacio, kiu estus eterna, se la ŝildisto vivus eterne.

Tiam don Quijote proksimiĝis al Sancho kaj flustris al li en la orelon:

—Sancho, se vi volas, ke mi kredu kion vi vidis en la ĉielo, mi deziras, ke vi kredu kion mi vidis en la kaverno de Montesinos... kaj punkto.

[342] En tiuj famaj tapiŝoj aperas, kiam temas pri scenoj de la Romana epoko, rajdantoj sur ĉevaloj sen piedingoj, ĉar ĉi lastajn ne uzis la Romanoj.

[343] Kun la du kruroj sur la sama flanko.

[344] Vilaĝo en la provinco Ciudad Real, unu el la lokoj kie la Santa Hermandad ekzekutis per paf-arkoj krimulojn kondamnitajn je morto.

[345] Faetono, falinta el sia ĉiela veturado pro nesingardemo, laŭ la greka mitologio.

[346] Temas pri la sturmo kaj prirabo de Romo, en 1527, fare de hispanaj trupoj sur la komando de la franca Carlos de Montpensier, duko de Borbón, kiu mortis en la batalo.

[347] Popola nomo de Plejado, aro de sep steloj en la konstelacio Taŭro.

[348] «kapro», en la hispana, signifas ankaŭ viro, kiu konsentas la adultron de sia edzino. Sancho, laŭ sia respondo, bone kaptis la intencon de la duko. «Porti la kornojn» signifas esti kokrata. Per ĉi respondo de Sancho, Cervantes eble aludis difinitan nobelon aŭ aŭtoron, en kies blazono sidus duonluno.

Ĉapitro 42

Pri la konsiloj de don Quijote al Sancho Panza antaŭ ol ĉi lasta komencas regi la insulon, kaj pri aliaj gravaj aferoj

La gedukoj tiel multe kontentiĝis je la amuza kaj plaĉa aventuro de Dolorida, ke ili decidis daŭrigi la farson, vidante, kiel facile mistifikeblaj estas la objektoj de iliaj ŝercoj. Tiel do, ili instrukiis siaj servistoj kaj regnantoj pri la maniero trakti Sanchon en la afero de la regado de la promesita insulo. Kaj unu tagon post la flugo de Clavileño, la duko diris al Sancho, ke li preparu sin okupi la postenon de gubernatoro, kaj ke liaj insulanoj jam atendas lin, kiel pluvon oni atendas en majo.^[349]

Sancho riverencis kaj respondis:

—De kiam mi descendis de la ĉielo, post ol mi rigardis de ĝia impona alto kaj vidis la teron tiel eta, iom moderiĝis mia forta deziro gubernatori, ĉar, kian gravon havas regi super sinapa semeto, aŭ kian dignon kaj aŭtoritaton oni ricevas mastrante seson da homoj grandaj kiel aveloj? Vere, ŝajnis al mi, ke ne ekzistas pli da ili sur la tuta tero. Se via moŝto degnus doni al mi parteton de la ĉielo, larĝan eĉ se nur je unu mejlo, mi ĝin akceptus pli volonte ol la plej grandan insulon de la mondo.

—Konsideru, amiko Sancho —respondis la duko—, ke mi ne povas doni parton de la ĉielo, eĉ ne tiel etan kiel ungo, ĉar tiaj favoroj kaj rekompencoj estas rezervitaj nur al Dio. Mi donas al vi kion mi povas, nome, veran kaj solidan insulon, rondan, bonproporcian kaj ekstreme fertilan, kie, se vi scios

lerte regadi, vi povos akiri samtempe la riĉojn de la tero kaj de la ĉielo.

—Nu, bone, venu jam la insulo —respondis Sancho—. Mi klopodos regi ĝin tiamaniere, ke mi iros al la ĉielo spite al ĉiuj friponoj. Kaj ne pro ambicio aŭ pro vanta fiero mi volas levi min al pli altaj postenoj, sed pro la deziro scii, je kio gustas la gubernatoreco.

—Se vi gustumos ĝin unufoje, Sancho —diris la duko—, vi ne volos forlasi ĝin, ĉar dolĉegas ordoni kaj esti obeata. Kiam via mastro fariĝos imperiestro (kio nepre okazos, laŭ la iro de liaj aferoj) oni ne facile detronigos lin, kaj li sentos aflikton kaj pezan bedaŭron en sia koro, pensante pri la tempo, kiam li ankoraŭ ne imperiestris.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Mi imagas, ke regadi estas bona afero, eĉ se oni regas nur gregon da bovoj.

—Oni min enterigu apud vi, Sancho —diris la duko—. Ĉion vi scias! Kaj mi esperas, ke vi estos tiel bona gubernatoro, kiel via saĝo promesas. Sed nun, ni lasu ĉi aferon. Memoru, ke jam morgaŭ vi devos iri okupi la gubernatoran postenon de la insulo, kaj ĉi-vespere oni havigos al vi la kostumon adekvatan al via rango kaj ĉion necesan por via vojaĝo.

—Oni vestu min laŭvole —respondis Sancho—. Sed en ajna kostumo mi estos la sama Sancho Panza.

—Vi pravas —diris la duko—. Sed la vestoj devas kongrui kun la ofico aŭ la posteno okupata. Ne decus, se juristo portus kostumon de soldato, aŭ soldato kostumon de pastro. Vi, Sancho, estos vestita parte kiel juristo, parte kiel kapitano, ĉar en la insulo, kies regadon mi cedas al vi, la armoj tiel necesas kiel la letroj.

—Pri la letroj mi apenaŭ scias ion —respondis Sancho—, ĉar mi ne konas ankoraŭ la abocon. Sed sufiĉas, ke mi memoru la dekalogon, por esti bona gubernatoro. Rilate al la armoj, mi uzos ĝismorte kiajn oni donos al mi. Kaj ĉio okazu laŭ la volo de Dio.

—Kun tiel bona memoro, Sancho, vi ne povos fari erarojn —diris la duko.

Ĉi-momente aperis tie don Quijote, kaj kiam li sciis, kio okazas, kaj kiel baldaŭ Sancho okupos sian postenon, la hidalgo, kun la permeso de la duko, prenis la ŝildiston je la mano kaj kondukis lin al sia ĉambro por konsili lin, kiel li devus konduki en sia ofico. Ili eniris do en lian ĉambron, don Quijote fermis post si la pordon, preskaŭ devigis la ŝildiston sidiĝi apud li kaj kun solena voĉo diris:

—Senfine mi dankas la ĉielon, amiko Sancho, ke antaŭ ol la sorto min favorus, la fortune venis renkonti kaj akcepti vin. Mi, kiu atendis mem sukcesojn por rekompenci vin pro viaj servoj, troviĝas nun ĉe la komenco atingi eventualan profiton, dum vi, antaŭtempe kaj kontraŭ ĉiaj logikaj supozoj, vidas vian deziron plenumita. Kelkaj intrigas, ĝenas, petas, suplikas, klopodas senĉese kaj insistas, sed ne ricevas la oficon deziratan. Kaj jen, prezentiĝas alia, kaj, sen scii kiel aŭ kial, troviĝas en la posteno, kiun la ceteraj pretendis. Al ĉi okazoj tre adekvatas la diro, ke ekzistas bona kaj mava sorto inter la aspirantoj. Mi opinias, ke vi estas vera ŝtipo. Tamen, sen klopodi de la mateno ĝis la nokto, sen ia penado de via flanko, vi, per la nura fakto, ke vin tuŝis la spiro de la vaganta kavalirismo, vidas vin, senplie, gubernatoro de unu insulo... Nenia bagatelo, vere! Mi diras ĉion ĉi, Sancho, por ke vi ne atribuu ĉi favoron al viaj propraj meritoj, kaj por ke vi danku unue la ĉielon, kiu tiel bone aranĝas la aferojn, kaj poste la grandecon implicitan en la profesio de la vaganta kavalirismo. Kun la koro inklina kredi

min, atentu, filo, kion mi, via Katono, vin konsilos, ĉar mi volas esti la stelo, kiu orientu vin atingi sekuran havenon el inter la tempestaj ondoj de ĉi maro, kien vi iras navigi: ĉar la gravaj oficoj kaj postenoj estas nur profundaj golfoj da konfuzo.

»Unue, filo, vi devas timi Dion: ĉar en ĉi timo sidas la saĝo, kaj, se saĝa, vi neniam povos erari.

»Due, vi devas konsideri kio vi estas kaj, plej malfacila tasko imagebla, klopodi koni vin mem. El tia konado vi lernos ne ŝveli de fiero, kiel la rano, kiu deziris grandi kiel bovo. Ĉar, simile al la pavo, kies parada vosto falas, kiam la birdego rimarkas la turpon de siaj piedoj, via orgojlo vundiĝos de la penso, ke vi gardis porkojn en via vilaĝo.

—Efektive, tio okazis en mia infanaĝo —respondis Sancho—. Sed poste, kiam knabo, mi gardis, ne porkojn, sed anserojn. Sed ŝajnas al mi, ke ĉio ĉi ne menciindas: ne ĉiuj regantoj devenas de reĝaj familioj.

—Vi pravas —diris don Quijote—. Tial, la personoj sen nobela origino, devas kombini la gravon de siaj funkcioj kun ia mola afablo, kiu, gvidata de la prudento, liberigu ilin de la klaĉado, kies pikoj trafas ĉiun rangon kaj staton.

»Konfesu senkaŝe, Sancho, la humilon de via origino, kaj ne hontu diri, ke vi devenas de kampara gento; tiel, vidante, ke vi ne hontas, oni ne havos la intencon humiligi vin. Prefere estu virte humila ol peke orgojla. Nekalkuleblaj personoj de modesta deveno levis sin al la plej supraj rangoj pontifikaj kaj imperiestraj, kaj mi povus citi al vi tiom da ekzemploj ĉi-riate, ke vi laciĝus aŭskulti.

»Atentu, Sancho: se vi sekvas la vojon de la virto kaj plenumas nur virtajn agojn, vi ne devas senti envion kontraŭ la personoj, kiuj naskiĝis sinjoroj kaj princoj, ĉar la sangon

oni heredas, sed la virton oni akiras, kaj la virto per si mem havas pli da valoro ol la sango.

»Tiel do, se iu el viaj familianoj okaze venus viziti vin al via insulo, ne ignoru aŭ ofendu lin; male, akceptu lin afable kaj kompleze kaj regalu lin: tiel vi kontentigos Dios, ĉar Li ne ŝatas, ke oni disdegnu kion Li kreis, kaj krome, vi kondutos konforme al la leĝoj de la naturo.

»Se vi venigos vian edzinon (ne konvenas, ke viro okupata en funkcioj de regado tenu for dum longa tempo sian edzinon) instruu kaj eduku ŝin kaj poluru ŝian naturon, ĉar, se ordinare saĝa gubernatoro gajnis al si prestiĝon, aliflanke lia edzino, se rustika kaj stulta, ĝin ruinigas kaj detruas.

»Se vi vidviĝus (kio povus okazi) kaj pro via posteno vi devus edziĝi denove al virino de pli alta rango, ne prenu ŝin tia, ke ŝi uzu vin kiel logilon kaj fiŝkanon por sia persona profito: ĉar, verdire, pri ĉio, kion ricevas la edzino de juĝisto, respondos la edzo antaŭ la aŭtoritato de Dio kaj devos repagi kvaroble kiom lia edzino akceptis sen lia scio.

»Neniam lasu vin regi de la kaprico kaj de la arbitro, kiel faras la stultuloj, kiuj kredas sin inteligentaj.

»Montru pli da kompatato, sed ne pli da justeco, por la larmoj de la paŭperaj, ol por la pledoj de la riĉaj: klopodu trovi la veron inter la promesoj kaj donacoj de la riĉaj, same kiel inter la ploroj kaj la impertinento de la paŭperaj.

»Ĉiuokaze kiam la justeco permesos, ne ŝargu sur la deliktulon la tutan rigoron de la leĝo: juĝisto severa ne havas pli bonan famon ol juĝisto kompatema.

»Se okaze fleksiĝus al vi la vergo de la justico, ĝi fleksiĝu, ne pro la pezo de la donacoj, sed de la mizerikordo.

»Se vi devus juĝi super afero de malamiko via, ignoru la kaŭzon de via ofenditeco kaj atentu nur iri ĝis la vero de la kazo.

»Ne permesu, ke propra pasio blindigu vin en fremda afero, ĉar, ĝenerale, viaj eraroj estus, aŭ neripareblaj, aŭ ripareblaj nur je la kosto de via reputacio aŭ eĉ de via havo.

»Se bela virino petus de vi justecon, deturnu la okulojn de ŝiaj larmoj kaj la orelojn de ŝiaj ĝemojn, kaj konsideru senurĝe la esencon de ŝia plendo, se vi ne volas, ke via prudento dronu en ŝia ploro kaj via virto en ŝiaj suspiroj.

»Ne mistraktu parole la personon, kiun vi devas submeti al fizika puno; ne necesas aldoni insulton al la torturado de kompatinda homo.

»Konsideru la kulpulon submetitan al via jurisdikcio kiel povran viktimon regatan de la inklinoj de nia perversa naturo kaj, sen ignori la rajton de liaj akuzantoj, laŭpove montru vin al li pardonema kaj mizerikorda, ĉar, kvankam ĉiuj atributoj de Dio estas egalaj, ŝajnas al ni pli bela kaj valora la mizerikordo ol la justeco.

»Se vi sekvos ĉi regulojn kaj preceptojn, Sancho, viaj tagoj estos longaj, via famo eterna, viaj rekompencoj abundaj kaj via feliĉo nesuperebla; vi edzigos viajn filojn laŭdezire, kaj ili kaj viaj nepoj havos moŝtajn titolojn; vi vivos en paco kaj ĝuos la estimon de la homoj, kaj en la lastaj paŝoj de via vivo, en olda aĝo milda kaj matura, la morto atingos vin, kaj la molaj kaj delikataj manoj de viaj pranepoj fermos al vi la okulojn. Ĉi instrukcioj koncernas la edukon de via animo. Nun aŭskultu kion mi devas diri por la bono de via korpo.

[[349](#)] T.e. kun senpacienco kaj espero, kiel la kampuloj atendas la pluvojn de la printempo kiel garantion de riĉa rikolto.

Ĉapitro 43

Pri la dua serio da konsiloj de don Quijote al Sancho

Kiu, aŭskultinte ĉi lastan paroladon de don Quijote, ne konsiderus lin tre inteligenta kaj bonintenca? Nu, kiel ofte menciite laŭlonge de ĉi granda historio, la cerbo de la hidalgo iris promeni, nur kiam ĝi okupiĝis pri kavaliraj aferoj; en ĉio cetera li montris posedi klaran kaj subtilan menson, do liaj faroj ofte diskreditis lian saĝon, kaj lia saĝo liajn farojn. Sed en la dua serio de konsiloj al Sancho, li rivelis sin homo de granda sprito kaj levis ĝis la plej alta grado sian frenezon kaj sian saĝon. Sancho aŭskultis lin kun ega atento kaj klopodis reteni en la memoro liajn konsilojn, pensante helpi sin per ili, por solvi la eventualajn komplikojn de sia regado. Don Quijote daŭrigis:

—Rilate al la flegado de via korpo kaj de via domo, mi unue rekomendas al vi, Sancho, ke vi estu purama kaj tondu viajn ungojn, sen lasi ilin kreski, ne kiel faras certas personoj, kies nescio movas ilin pensi, ke la longo de la ungoj beligas la manojn: kvazaŭ tiaj superfluaĵoj kaj apendicoj, ne tondataj pro stranga kaj naŭza kaprico, estus ungoj kaj ne krifoj de falko.

»Via kostumo ne sidu al vi loza kaj ĉifoplana: ĉar senordaj vestoj montras indicon de neglektema karaktero, escepte se tia neglekto kaj senzorgo kaŝas ian difinitan intencon, kiel laŭdire estis la kazo de Julio Cezaro.^[350]

»Sobre taksu la valoron de via ofico: kaj se vi juĝus ke la rango de via posteno postulas, ke viaj servistoj portu livreon, ĉi peco estu utila kaj modesta pretere ol pompa kaj parada. Kaj disdonu inter servistoj kaj senhavaj homoj; mi volas diri,

ke, se vi povus vesti ses paĝiojn, vestu nur tri, kaj poste tri mizerulojn, kaj tiel vi havos paĝiojn por la ĉielo kaj por la tero. La vantaj kaj fanfaronaj ne komprenus ĉi novan manieron doni livreojn.

»Ne manĝu ajlojn aŭ cepojn, por ke ilia odoro ne montru vian rustikan originon.

»Marŝu lante; kaj ankaŭ parolu lante, sed ne ĝis la ekstremo doni la impreson, ke vi aŭskultas vin mem: ĉar ĉia afektado mavas.

»Manĝu sobre en la tagmezo kaj eĉ pli sobre en la vespero: la sano de la tuta korpo originas en la kaldrono de la stomako.

»Modere trinku, konsiderante, ke tro da vino nek gardas sekreton nek plenumas promeson.

»Zorgu, Sancho, ne maĉi plenbuŝe aŭ rukti antaŭ personoj.

—Tion pri «rukti» mi ne komprenas —diris Sancho.

—«Rukti», Sancho —klarigis don Quijote— signifas *regoldar*, kaj ĉi lasta estas unu el la plej vulgaraĉaj vortoj de nia lingvo. Tial la edukitaj homoj helpas sin per la latina kaj diras rukti anstataŭ *regoldar* kaj rukto anstataŭ *regüeldo*. Se certaj personoj ne komprenas ankoraŭ la novajn esprimojn, ne gravas; kun la paso de la tempo la uzado ilin ĝeneraligas, kaj la lingvo riĉiĝas dank' al la uzo kaj al la influo de la popolo.

—Vere, sinjoro —diris Sancho—, mi penos reteni en la memoro vian konsilon pri *regoldar*, ĉar mi ofte eligas tiajn *regüeldos*.

—«Rukti», Sancho, ne «regoldar» —korektis don Quijote.

—«Rukti» mi diros de nun, kaj ĵuras ke mi ne forgesos.

—Memoru ankaŭ, Sancho, ke vi ne devas ŝarĝi vian konversacion per egaj kvantoj da proverboj, kiel vi ordinare faras; ĉar kvankam la proverboj estas koncizaj sentencoj, ofte vi uzas ilin tiel neadekvate, kvazaŭ vi enprenus ilin je la haroj, ke ili pli similas al absurdoj.

—Nur Dio povus tion korekti —respondis Sancho—, ĉar mi tenas en la kapo pli da proverboj ol tuta libro, kaj, kiam mi parolas, ili puŝiĝas en mia buŝo, batalas inter si por eliri, kaj la lango ĵetas eksteren la unue trafitan proverbon, eĉ se ĝi ne kongruas kun la objekto de la konversacio. Sed de nun mi zorgos uzi nur proverbojn laŭajn al la gravo de mia posteno, ĉar «en bone provizita domo, facile kuiriĝas la manĝo», kaj «disdonanto de ludkartoj ne faras la tranĉon», kaj «kiu donas la alarmon sidas sekura» kaj «necesas saĝon disponi por gardadi kaj por doni».

—Nu, antaŭen, Sancho, ne haltu —diris don Quijote—. Torentu, kaskadu viaj proverboj! Ne ĉesu! «Min punas mia patrino, sed mi drinkas plu la vinon»: mi ĵus diris al vi, ke vi uzu ŝpareme la proverbojn, kaj en unu momento vi ŝutis litanion da ili, tiel adekvataj al nia temo kiel al la luno. Nu, Sancho, ne ŝajnas al mi mave uzi proverbon ĝuste aplikatan; sed uzi kaj trouzi ilin ieletrapele igas la konversacion plata kaj vulgara.

»Kiam vi rajdos sur ĉevalo, ne retroklinu la korpon super la postan parton de la selo, nek tenu la kruojn streĉitaj kaj apartigitaj de la ventro de la besto; sed sidu ne tre loze, ĉar alie vi donus la impreson rajdi sur azeno: laŭ la maniero rajdi, distingiĝas kavaliro de stalisto.

»Dormu modere: kiu ne levas sin kun la suno ne ĝuas la tagon. Kaj memoru, Sancho, ke la diligento estas patrino de

la bona sorto, kaj ke ĝia malo, la pigro, neniam sukcesas plenumi ajnan honestan aspiron.

»Nun mi donos al vi la lastan konsilon. Ĝi ne rilatas al la flegado de la korpo, sed mi deziras, ke vi ĝin bone memoru, ĉar mi kredas, ke ĝi estos al vi almenaŭ tiel utila kiel la antaŭaj. Temas pri tio, ke vi neniam diskutu koncerne ies genealogion, kaj precipe, ne komparu unu familion kun alia, ĉar nepre unu el la du montriĝos pli bona: kaj tiam la familio, kies suban staton vi evidentigis, abomenos vin, kaj la familio, kies pli altan rangon vi proklamis, eĉ ne dankos vin.

»Via kostumo konsistu el kuloto, longa saĵo, kaj mantelo iom pli longa. Sed tute ne rekomendindas la striktaj kulotoj, ĉar ili sidas bone nek al kavaliroj, nek al la gubernatoroj.

»En la nuna momento, mi ne plu memoras novajn konsilojn por vi. Kun la paso de la tempo, kaj laŭ la diversaj cirkonstancoj, mi diros al vi aliajn, se vi zorgos informi min pri la stato de viaj aferoj.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Mi komprenas, ke viaj rimarkoj estas bonaj, valoraj kaj pozitivaj. Sed, kiel ili povus utili al mi, se konsideri, ke mi ilin tute ne memoras? Verdire, la aferon pri mia dua edziĝo (se la okazo prezentiĝos) kaj pri la tondado de la ungoj mi ne forgesos; sed pri la ceteraj predikoj, implikoj kaj komplikoj mi tiel memoras kaj memoros, kiel pri la nuboj de la pasinta jaro. Pli bone do, se mi ricevus ilin en skriba formo: ĉar, kvankam mi ne scias legi aŭ skribi, mi ilin transdonus al mia konfesprenanto, kaj li enbatus ilin en mian kapon, kiam necese.

—Ho ve! —ekkriis don Quijote—. Kiel aĉe impresas gubernatoro, kiu ne scias legi kaj skribi! Sciu, Sancho, ke kiam homo ne konas legon kaj skribon, aŭ estas livamanulo,

oni konkludas, aŭ ke liaj gepatroj vivadis en tre mizera satato, aŭ ke li tiom perversas kaj malicas, ke li ne povis asimili virtajn kutimojn. Vi portas kun vi gravan mankon, kaj tial mi deziras, ke vi lernu almenaŭ signaturi vian nomon.

—Mi povas signaturi —respondis Sancho— ĉar, kiam mi estis pedelo de religia societo en mi vilaĝo, mi lernis skribi kelke de grandaj literoj, kiajn oni uzas por la markado de pakaĵoj. Krome mi simulos, ke mi havas la dekstran manon kripla, kaj ordonos, ke alia signaturu por mi; ekzistas rimedo por ĉio, se escepti la morton, kaj tial, ke mi tenos la ordon-bastonon kaj la aŭtoritaton, mi faros laŭvole, des pli, ke «kiu havas sian patron urbestro...».^[351] Kaj, ĉar mi estos gubernatoro, pli grava do ol urbestro... nu, ni vidos, ĉu oni kuraĝos disdegni kaj kalumnii min! «Oni venos por lano kaj mem estos tonditaj», kaj «kiun Dio preferas, tiu prosperas» kaj «la stultaj diroj de la riĉaj rangas en la mondo kiel maksimumoj». Kaj tial, ke kaŭze de mia posteno mi riĉos, kaj krome klopodos havi donaceman manon, oni ignoros miajn mankojn. «Ŝanĝiĝu al mielo kaj la muŝoj vin manĝos»; mia avino diris, ke «tiom oni valoras, kiom da oro oni trezoras»; kaj «kontraŭ forta mano la leĝo estas vana».

—Dio vin damnu, Sancho —interrompis lin don Quijote—. Ses-dek mil satanoj prenu vin kun viaj proverboj! Jam unu horon vi ilin ĵetadas senĉese, torturante min per ĉiu proverbo, unu post alia. Mi ĵuras, ke ĉi manio via kondukos vin al la pendingo. Pro la proverboj, viaj subuloj forpelos vin, aŭ ribelos kontraŭ vi. Diru, ŝtipo: kie vi trovas ilin? Kiel vi aplikas ilin, stulta? Mi mem, kiam mi volas laŭcele citi eĉ nur unu, penadas kaj ŝvitas, kvazaŭ fosante truon.

—Je Dio, sinjoro mastro, via moŝto plendas je bagateloj! —respondis Sancho—. Kial, per la diablo, vin ĉagrenas, ke mi uzas mian kapitalon? Mia sola riĉo, kaj mi ne havas alian, konsistas el proverboj super proverboj. Kaj ĝuste nun venas

en mian kapon aliaj kvar oportunaj kaj laŭcelaj, kiel oro al avara. Sed mi ne diros ilin al vi, ĉar «prudenta silento nomiĝas Sancho».^[352]

—Tia Sancho ne estas vi —diris don Quijote—. Vi ne prudentas silente, sed male, babiladas malice kaj ĝistede. Tamen mi dezirus sciiĝi pri viaj kvar proverboj tiel oportunaj kaj laŭcelaj venintaj nun en vian memoron. Mi fosas en la mia, kaj, kvankam ĝi estas sufiĉe bona, mi ne trovas eĉ unu proverbon adekvatan al nia interparolo.

—Kio pli adekvata —respondis Sancho— ol «inter du saĝo-dentoj ne enpuŝu la polekson»? Al «foriru de ĉe mi; kion vi volas de mia edzino?» nenio respondeblas. Kaj «se la kruĉo frapiĝas kontraŭ ŝtono, aŭ male, ĉiuokaze la kruĉo rompiĝas». Ĉi proverboj aplikeblas tute ĝuste: oni ne spitu sian gubernatoron aŭ mastron, ĉar oni ricevas la damaĝon, kiel okazas al la fingro metita inter la saĝo-dentoj aŭ, cetere, inter ajnaj molaroj. Kaj al la ordonoj de gubernatoro, nenio respondeblas, kiel al la frazo, «foriru de ĉe mi; kion vi volas de mia edzino?». Rilate al la ŝtono kontraŭ la kruĉo, eĉ la plej blinda vidas ĝian sencon. Tiel do, necesas, ke «kiu vidas la ligneron en fremda okulo, vidu trabon en la sia», por ke oni ne diru pri li, ke «la mortinto teruriĝas de la vundito». Kaj via moŝto bone scias, ke «la stulta pli konas ĉe si, ol la saĝa en fremda domo».

—Pri tio lasta vi ne pravas, Sancho —respondis don Quijote—, ĉar la stulta konas nenion en propra aŭ en fremda hejmo. Sur fundamento de stulteco oni ne povas starigi domon de saĝo. Kaj jam ni lasu ĉi aferon, Sancho. Se vi regos fuŝe, via estos la kulpo kaj mia la honto. Sed min konsolas, ke mi faris mian devon, konsilante vin tiel sincere kaj saĝe kiel mi kapablas. Per tio mi kvitiĝas de mia devo kaj de mia promeso. Dio vin gvidu kaj regu vin en via regado, Sancho, kaj Li liberigu min de mia suspekto, ke vi faros el via

gubernatoreco grandiozan kaĉon, kion mi povus eviti, dirante al la duko, ke ĉi grasa personeto estas nenio alia ol sako plena de proverboj kaj malico.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Se via moŝto opinias, ke mi ne taŭgas por la posteno, jam de nun mi rifuzas ĝin. Mi pli amas la nigran randon de ungeto de mia animo ol mian tutan korpon. Kaj la simpla Sancho povas vivteni sin per pano kaj cepo, anstataŭ regali sin per perdrikoj kaj kaponoj en sia gubernatora rango; des pli, ke la homoj grandaj kaj etaj, riĉaj kaj paŭperaj valoras la samon dum ili dormas. Kaj se via moŝto bone pensas la aferon, vi vidos, ke nur vi puŝis en mian kapon la ideon de la gubernatoreco, ĉar pri la regado de insuloj mi konas ne pli ol vulturo. Kaj se vi pensas, ke la diablo prenos min pro mia gubernatora rando, mi preferas iri kiel simpla Sancho en la ĉielon, ol kiel gubernatoro en la inferon.

—Je Dio, Sancho —diris don Quijote—. Eĉ se nur pro ĉi lastaj vortoj viaj, mi opinias vin inda regi gubernatore super mil insuloj. Vi havas bonan naturon kaj sen ĝi nenia saĝo valoras. Rekomendu vin al Dio kaj klopodu ne erari en viaj ĉefaj decidoj. Mi volas diri, ke vi devas teniĝi al la firma intenco agi juste en viaj aferoj, ĉar la ĉielo ĉiam favoras la bonajn aspirojn. Kaj ni iru manĝi, ĉar mi kredas ke la gedukoj nin atendas.

[350] Rakontas la latina aŭtoro Macrobio, ke Cicerono ŝercis pri kiel fuŝe kaj neglekte portis Julio Cezaro siajn vestojn.

[351] La cetero de la proverbo diras: «povas procesi senriske».

[[352](#)] Unue la proverbo tekstis: «Prudenta silento nomiĝas sankta» («santo», en la hispana). Kun la uzo, la vorto «santo» ŝanĝiĝis al «Sancho», do la proverbo tute ne aludas la ŝildiston de don Quijote.

Ĉapitro 44

Pri kiel oni sendis la ŝildiston Sancho Panza al ties gubernatora posteno, kaj pri la stranga aventuro okazinta al don Quijote en la kastelo

Oni legas en la originalo de ĉi historio, ke la tradukinto de la nuna ĉapitro ne faris fidelan transdonon de la vortoj de Cide Hamete, ĉar efektive la maŭro skribis riproĉon kontraŭ si mem, dirante, ke li verkis ĉi rakonton seka kaj monotona, tial, ke li sentis sin kvazaŭ devigita paroli nur pri don Quijote kaj Sancho kaj ne kuraĝis deflankiĝi de la temo per digresioj epizodoj pli interesaj kaj distraj. Li aldonis, ke teni la menson, la manon kaj la plumon ĉiam fiksitaj al la sama objekto egalas al neelporbla laboro tute ne fruktodona por la aŭtoro. Li diris ankaŭ ke, por eviti ĉi malavantaĝon, en la unua parto li helpis sin per la enmeto de kelkaj noveloj, kiel *La stulta scivolo* kaj *La kapitano en kaptiteco*, iasence senrilataj al la ĉefa historio, kvankam la ceteraj rakontoj havas konekton kun la aventuroj vere travivitaj de don Quijote, kaj sekve ne eblis ilia elimino. Li pensis ankaŭ, ke multaj legantoj, absorbitaj de la prodaĵoj de don Quijote ture ignorus la novelojn insertitajn en la historio, aŭ legus ilin sen atento kaj pacienco, ne rimarkante, ke ili havas konsiderindan valoron artan kaj stilan, kio evidentiĝus, se oni eldonus ilin aparte, sen ia ligiteco kun la frenezo de don Quijote kaj la stultaĵoj de Sancho. Tial, en ĉi dua parto, li ne volis inkluzivigi ajnan novelon rilatan, aŭ ne rilatan, al la ĉefa historio, kaj limigis sin enmeti kelke da epizodoj iom memstaraj sed fontintaj el la fundo mem de la veraj eventoj priskribitaj en ĉi historio. Kaj eĉ tiaj epizodoj aperas tre sporade kaj ne pli longaj ol la plej sobra rakontado postulas. Li fine diras, ke, kvankam li tenas sin strikte al la nura

historio, li posedas lerton, talenton kaj imagon sufiĉajn por verki pri io ajn en la mondo, kaj suplikas, ke oni ne disdegnu lian laboron, kaj ke oni laŭdu lin, ne pro tio, kion li skribas, sed pro tio, kion li ne skribis.

La aŭtoro poste daŭrigas la rakontadon de la historio, dirante, ke don Quijote parole donis siajn konsilojn al Sancho en la mateno, kaj ke, en la sama tago, post la manĝohoro, li enmanigis al li la konsilojn en skriba formo, por ke la ŝildisto disponu laŭokaze, ke alia persono legu ilin al li. Sed apenaŭ Sancho ricevis la paperon, li perdis ĝin, kaj ĝi trafis en la manojn de la gedukoj, kiuj denove miris je la frenezo kaj la saĝo de don Quijote. Nu, daŭrigante sian ŝercon, en la sama vespero ili sendis Sanchon kun granda eskorto al la vilaĝo, kiu, koncerne lin, rolus kiel insulo. Okazis, ke la persono ŝarĝita konduki ĉi aferon estis la inteligenta kaj sprita majordomo de la duko —sen inteligento ne eblas sprito— antaŭe ludinta tre lerte la rolon de la grafino Trifaldi, kiel jam scias la leganto. Dank' al sia talento kaj al la instrukcioj de la gedukoj pri tio, kiel li traktu Sanchon, li ege sukcesis plenumi sian taskon.

Okazis tamen, ke, tuj kiam Sancho vidis la majordomon, li imagis vidi la veran mienon de Trifaldi, do li sin turnis al sia mastro kaj diris:

—Sinjoro, la diablo prenu min tuj, se via moŝto ne opinias, ke la vizaĝo de ĉi majordomo de la duko estas la sama vizaĝo de Dolorida.

Don Quijote atente rigardis la majordomon kaj diris al Sancho:

—Ne ekzistas motivo por ke la diablo vin prenu, Sancho. Evidentas, ke la vizaĝo de Dolorida tute similas la vizaĝon de la majordomo. Tamen ĉi lasta ne estas Dolorida, ĉar alie

temus pri granda absurdo, kaj ni ne troviĝas nun en la ĝusta momento fari esplorojn, kiuj kondukus nin en veran labirinton. KREDU MIN, AMIKO SANCHO: NI TRE BEZONAS ELKORE PREĜI AL NIA SINJORO, KE LI LIBERIGU NIN DE MAVAJ SORĈISTOJ KAJ MAGIISTOJ.

—Ne temas pri ŝerco, sinjoro —respondis Sancho—. Antaŭe mi aŭdis lin paroli, kaj ŝajnis, kvazaŭ la voĉo de Trifaldi sonus en miaj oreloj. Bone, mi ne plu mencios la aferon, sed de nun mi ne ĉesos teni la okulojn apertaj kun la celo trovi ian novan signon, kiu povus, aŭ konfirmi, aŭ detruigi mian suspekton.

—Tion vi devas fari, Sancho —diris don Quijote—. Kaj ne forgesu informi min pri viaj eventualaj eltrovoj ĉi-rilate, kaj pri ĉio okazonta al vi dum via gubernatoreco.

Fine Sancho komencis sian vojaĝon akompanate de multaj homoj, vestita kiel letrulo, kun larĝa mantelo el flava kamloto muara kaj kun ĉapo el la sama ŝtofo; li rajdis sur mulo kun kurtaj piedingo-rimenoj, kaj tuj poste, laŭ instrukcioj de la duko, iris lia azeno garnita per tute nova harniso kaj silkaj ornamoj. Sancho turnis la kapon de tempo al tempo por rigardi sian azenon, en kies akompano li iris tiel kontenta, ke li ne interŝanĝus sin kun la imperiestro de Germanujo. Adiaŭante la gedukojn, li kisis iliajn manojn kaj petis la benon de sia mastro, kion don Quijote donis kun larmoj kaj Sancho ricevis plorsingulte.

Lasu la bonan Sancho iri pace en la akompano de Dio, afabla leganto, kaj atendu du buŝelojn da rido, kiam vi scios, kiel kondukis en sia posteno. Dume, turnu vian atenton al tio okazinta al lia mastro en la sama nokto. Se vi ne ridos, almenaŭ viaj lipoj streĉiĝos en simian grimaceton, ĉar la farojn de don Quijote oni devas honori per rido aŭ per admiro.

Nu, la historio diras, ke apenaŭ Sancho ekiris, don Quijote sentis sian solecon kaj volonte revokus la enoficigon de sia ŝildisto kaj revenigus lin al sia flanko, se tio eblus. La dukino rimarkis lian melankolion, demandis al li, kial li tristas, kaj aldonis, ke, se tion kaŭzas la foresto de Sancho, ŝi tenas en sia domo nombron da ŝildistoj, duenjoj kaj damoj pretaj servi lin tute laŭ lia volo.

—Efektive, sinjorino —respondis don Quijote—, mi sentas la mankon de Sancho, sed tio ne estas la ĉefa kaŭzo de mia deprimiteco. Rilate al la multaj de proponoj de via moŝto, mi povas akcepti nur la bonvolon, kiu diktas ilin, kaj mi suplikas vin, ke vi permesu, ke nur mi prizorgu mian personon.

—Vere, sinjoro don Quijote —diris la dukino—, ne okazos tiel, ĉar kvar el miaj ĉambristinoj, belaj kiel floroj, servos vin.

—Ili ŝajnus al mi, ne floroj, sed dornoj enpuŝitaj en mian koron —respondis la hidalgo—. Al ili estus pli facile flugi en la aero ol eniri en mian ĉambron! Se Via Grandeco volas plu verŝi sur min ne merititajn favorojn, permesu, ke mi zorgu pri mi mem en la interno de mia ĉambro; mi devas starigi muron inter mia deziro kaj mia virto kaj ne volas, ke ĉi kutimo rompiĝu kaŭze de via regalemo al mia persono. Vere, mi preferas dormi vestita, ol permesi, ke oni min nudigu.

—Sufiĉe jam, sinjoro don Quijote, eĉ ne uno vorton plian —diris la dukino—. Mi ordonos, ke eĉ ne unu muŝo eniru en vian ĉambron, des malpli unu servistino. Mi ne kapablus permesi, ke la ĉasto de don Quijote suferu, ĉar, ŝajnas al mi, inter viaj multaj virtoj plej brile staras la pudoro. Vestu kaj nudigu vin sola kaj laŭ via plaĉo, kiel kaj kiam vi volos. Oni tute ne ĝenos vin. En via ĉambro vi trovos la vazon, kiu, se vi dormas malantaŭ ŝlositaj pordoj, necesas por ke la premo de natura bezono ne devigu vin aperti ilin. La granda Dulcinea de El Toboso vivu tra mil epokoj, kaj ŝia nomo

famiĝu ĉirkaŭ la tuta tero, tial, ke ŝi havas la meriton esti amata de tiel kuraĝa kaj virta kavaliro; kaj la bonvola ĉielo inspiru la Sancho Panza, nia gubernatoro, la deziron, ke li finu baldaŭ sian sinvipadon, por ke la mondo ĝuu denove la belecon de tiel granda sinjorino!

—La esprimoj de Via Alteco respegulas vian karakteron — respondis don Quijote—, ĉar el la buŝo de virtaj damoj povas eliri nenia mava vorto. Pro viaj laŭdoj, Dulcinea ricevos en ĉi mondo pli da gloro kaj feliĉo, ol se ŝin laŭdus unuvoĉe la plej elokventaj homoj de la tero.

—Bone, sinjoro don Quijote —diris la dukino—. Nun estas la horo manĝi, kaj la duko certe atendas nin. Via moŝto venu, ni manĝu, kaj vi iru frue dormi, ĉar la longo de via hieraŭa vojaĝo al Candaya certe igis vin laca.

—Tute ne, sinjorino —respondis don Quijote—. Mi povus ĵuri al vi moŝto, ke neniam antaŭe mi rajdis ĉevalon pli senskuan kaj glit-kuran ol Clavileño, kaj ne komprenas, kial Malambruno senigis sin je tiel leĝera kaj milda rajdobesto kaj bruligis ĝin sen ia motivo.

—Eble li kondukis tiel —diris la dukino— ĉar, sentante penton pro siaj misfaroj kontraŭ Trifaldi kaj kompanio, kaj kontraŭ aliaj personoj, kaj pro la krimoj, kiujn li certe plenumis kiel sorĉisto kaj magiisto, li decidis detrui la instrumentojn de sia arto, kaj tial, ke Clavileño estis la ĉefa el ili kaj kaŭzis al li pli da zorgoj en liaj vagadoj de lando al lando, li bruligis ĝin... Sed la cindroj de ĉi besto kaj la surlanca pergameno eternigos la kuraĝon de la granda don Quijote de La Mancha.

La kavaliro refoje dankis la dukinon kaj, post la manĝo, retiris sin sola en sian ĉambron, kaj ne konsentis, ke ajna persono eniru kun li por lin servi: ĝis tia ekstremo li timis

alfronti tenton kapablan movi aŭ devigi lin forgesi la ĉaston, kiun li gardis al sia sinjorino Dulcinea, kaj ĉi-rilate li ĉiam klopodis imiti la virtan konduton de Amadís, floro kaj spegulo de la vagantaj kavaliroj. Li fermis la pordon post si, nudigis sin ĉe la lumo de du vaksaj kandeloj, kaj dum li demetis siajn ŝuojn (ho misfortuno ne inda je tia kavaliro!) ŝiriĝis, ne suspiroj el lia brusto, kio diskreditus lian perfektan edukitecon, sed dudek du maŝoj de uno ŝtrumpo, kiu prenis la aspekton de ĵaluzio. La bona kavaliro tre afliktiĝis kaj volonte donus eĉ unu-uncan arĝentan moneron por disponi tie iometon da verda silko, ĉar la ŝtrumpoj estis verdaj.

Ĉi tie Benengeli skribas la jenan eksklamacion: «Ho mizero! Mizero! Mi ne komprenas, kia motivo movis la grandan poeton de Córdoba^[353] nomi vin “sankta, sed disdegnata donaco”! Kvankam maŭro, mi bone scias, pro miaj rilatoj kun la kristanoj, ke la sankteco baziĝas sur karitato, humilo, fido, obeo kaj malriĉo. Sed mi diras, ke se iu kontentas, vivante malriĉe, li sendube posedas iom de la naturo dia, ĉar lia malriĉo apartenas al la speco aludita de unu el la plej grandaj sanktuloj: “Havu ĉion, kvazaŭ nenion vi posedus”,^[354] kaj tio nomiĝas malriĉo de spirito. Sed vi, la dua speco de malriĉo (kaj pri vi mi parolas), kial vi furiozas kontraŭ la hidalgos kaj la homoj de moŝta nasko, pli ol kontraŭ aliaj personoj? Kial vi puŝas ilin cirkon siajn ŝuojn, kaj porti sur la vesto butonojn de diversaj tipoj: kelkajn el silko, kelkajn el krinoj, kelkajn el vitro? Kial iliaj kolumoj devas vidiĝi ĉiam ĉifitaj kiel folio de skarolo, kaj ne apertaj kaj glataj?». (Ĉi vortoj de la maŭro montras, ke jam de tre longe uziĝas la kolumoj amelitaj). Poste li daŭrigis: «Ho vi, kompatinda homo de moŝta nasko, kiu nutras vian honoron per mizerega manĝo malantaŭ fermitaj pordoj, kaj poste eliras sur la straton kun hipokrita dentopikilo inter la lipoj, kvankam vi manĝis nenion, kio povus pravigi ĝian uzon! Ho vi, kompatinda homo, kies honoro teruriĝas, kiam vi pensas, ke de la distanco de unu mejlo rimarkeblas la flikaĵo de via ŝuo,

la ŝvitomakuloj de via ĉapelo, la disfadeniĝo de via mantelo kaj la malsato de via stomako!».

Ĉi pensoj revenis en la menson de don Quijote, kiam li observis la ŝiriĝon de la maŝoj. Sed li konsoliĝis, vidante, ke Sancho lasis al li paron da longaj botoj, kaj li decidis, ke li surmetos ilin en la sekvanta tago. Fine la hidalgo kuŝiĝis pensema kaj trista kaŭze de la foresto de Sancho kaj de la neriparebla difektiĝo de sia ŝtrumpo, kies maŝojn li volonte flikus eĉ per fadeno de alia koloro, kvankam tio estas unu el la plej grandaj signoj de manko en la mizera vivo de hidalgo. Li estingis la flamon de la kandeloj, sed ne povis ekdormi, ĉar estis varme. Li ellitiĝis, iom apertis la fenestron de krado rigardanta al bela ĝardeno, kaj aŭdis, ke homoj paŝas kaj parolas tie. Li ekaŭskultis atente, kaj la voĉoj en la ĝardeno tiel leviĝis, ke ili atingis klare lian oreilon:

—Nu, Emerenciana —diris unu el la voĉoj—, ne urĝu min kanti, ĉar vi scias, ke, de kiam ĉi kavaliro eniris ĉi kastelon, kaj miaj okuloj lin rigardis, mi scias, ne kanti sed plori. Krome, nia sinjorino havas leĝeran dormon, kaj mi ne volus, eĉ kontraŭ la tuta oro de la mondo, ke ŝi trovu nin ĉi tie. Kaj, eĉ se ŝi ne vekiĝus, miaj kantoj vanus, se ĉi nova Eneo, veninta en ĉi landon por disdegni min, plu dormus sen vekiĝi.

—Ne faru al vi zorgon pri tio, kara Altisidora —respondis alia voĉo—. La dukino dormas, same kiel la ceteraj personoj de ĉi domo, kun la ebla escepto de ĉi mastro de via koro kaj perturbanto de via animo, ĉar mi ĵus aŭdis lin aperti la fenestron de sia ĉambro. Kantu do, povra amikino, softe kaj milde je la sonoj de via harpo, kaj se la dukino aŭdus nin, ni ekskuzus nin, dirante, ke la vetero tro varmas.

—Tio ne estas la afero, Emerenciana —diris Altisidora—. Okazas, ke mi ne volus, ke mia kanto rivelu la staton de mia

koro, ĉar la homoj nesciaj pri la nerezistebla forto de la amo konsiderus min frivola kaj kapricema pucelo. Tamen, okazu io ajn: preferindas honto sur la vizaĝo ol vundo en la koro.

Ĉe tio oni aŭdis mildegan ekludon de harpo, kaj don Quijote, ĝin aŭskultante, rigidiĝis de miro. Ĉi-momente venis al li en la memoron nekalkulebla nombro da similaj aventuroj bazitaj sur fenestroj, kradoj, ĝardenoj, muzikoj, galantaĵoj kaj am-svenoj, kiel priskribite en liaj absurdaj libroj kavaliraj. Poste li imagis, ke unu el la damoj de la dukino enamiĝis al li, kaj ke ŝia pudoro devigas ŝin teni sekreta sian pasion. Li tremis ĉe la penso, ke li povas cedi al ŝia amo, sed promesis al si ne lasi sin venki. Rekomendante sin elkore al sia sinjorino Dulcinea de El Toboso, li decidis aŭskulti la muzikon; kaj por montri, ke li troviĝas tie, li intence ternis, ĉe la granda kontento de la puceloj, ĉar ili plej deziris, ke don Quijote ilin aŭskultu. Tiel do, Altisidora prove pinĉis la kordojn, agordis la harpon kaj komencis kanti ĉi romancon:

Ho vi, kiu kuŝas dorme
inter litotukoj blankaj
kaj de nokto ĝis mateno
ronkas sur la mol' matraca!

Plej kuraĝa kavaliro
naskiĝinta en La Mancha,
plej honesta kaj valora
ol la fajna or' araba:

Aŭdu ĉi pucelon tristan,
belan, sed ankaŭ senŝancan,
ĉar en via okulfajro
mia koro ture ardas.

Misfortunojn vi renkontas
dum vi aventure vagas,

kaj, vundinte, vi rifuzas
la rimedon kuracantan.

Diru jam, junul' impeta
—de l' ciel' estu benata!—,
ĉu vi kreskis en Libio
aŭ en la montar' de Jaca.

Ĉu vin vartis la serpentoj
meze de ravinoj aspraj?
Ĉu vin nutris la hororo
de dezertoj vaste vastaj?

Bone povas Dulcinea
—plumpa junulino sana—
vanti, ke ŝi plene venkis
tigran el la plej sovaĝaj.

Tial ŝi akiros famon de
Henares ĝis Jarama,
kaj de Taj' ĝis Manzanares,
de Pisuerga ĝis Arlanza.

Mi kun ŝi min interŝanĝus,
kaj, por montri min tre danka,
mi donacus a ŝi jupon
kun or-franĝoj vere ĉarmaj.

Kuŝu mi en viaj brakoj
kaj, se ne, en lito flanka,
ke mi gratu vian kapon,
por ke iĝu ĝi senskvama.

Mi tro petas kaj ne indas
je favoro tiel granda.
Eĉ piedojn viajn froti

al mi ŝajnas revo rava.

Mi regalus vin per kufoj,
per arĝentaj ŝuoj fajnaj,
per kulotoj el damasko
kaj per mantelet' holanda.

Mi regalus vin per perloj,
ĉiu kun grandeco gajla:
ĉiu estus ja la unika,
sed l' aliaj ĝin egalas.

El Tarpeja Roko via,
vi, Nerono de La Mancha,
ne rigardu kun disdegno,
ke, pro vi, mi arda flamas.

Estas mi pucel' tenera
kaj ne pli ol dekkvin-jara:
nur dek kvar kaj tri monatojn
—ĵuras mi je Di'— mi havas.

Mi tre lindas kaj gracias,
bele paŝas kaj ne lamas.
Miaj haroj lilieskaj
longe ĝis la ter' kaskadas.

Kvankam larĝas mia buŝo
kaj la nazo iom platas,
mian belon alten levas,
la dentar' topaze flava.

Se vi aŭdas mian voĉon,
vi ĝin taksos plej agrabla,
kaj mi havas la staturon
ĝuste super kresko nana.

Tiuj ĉarmoj, kaj aliaj,
al viaj piedoj falas.
Estas mi Altisidora,
ĉambristino ĉi-palaca.

Ĉi tie finiĝis la romanco de la amofrapita Altisidora, kaj komencis miri la sopirata don Quijote. Suspirante li murmuris al si:

—Kiel senfortuna vaganto mi estas! Kial la puceloj senescepte enamiĝas al mi ĉe la unua rigardo? Ho, trista fato de la senegala Dulcinea! Kial oni ne lasas ŝin trankvila, ke ŝi ĝuu la nekompreneblan firmecon mian? Kion vi volas de ŝi, reĝinoj? Kial vi ŝin persekutas, imperiestrinoj? Kial vi furiozas kontraŭ ŝi, puceloj inter dek kvar kaj dek kvin jaroj? Lasu, lasu, ke ŝi, kompatinda, ĝuu kaj paradu la sorton, kiun la amo donis al ŝi, cedante al ŝi, mian koron kaj submetante al ŝi mian animon! Sciu, bando de enamiĝintaj virinoj, ke mi molas kiel pasto nur por Dulcinea, kaj duras kiel diamanto por la ceteraj. Por ŝi mi estas mielo, por la aliaj galo. Por mi, nur Dulcinea estas bela, diskreta, honesta, gracia kaj moŝta, kaj la ceteraj turpaj, stultaj, frivolaj kaj bas-familiaj. Por ke mi apartenu al ŝi, ne al alia, la naturo metis min en la mondon. Altisidora kantu aŭ ploru; desperu la damo, pro kies kulpo oni muelis min en la kastelo de la ensorĉita maŭro: malgraŭ ĉio, mi devas aparteni al Dulcinea iel aŭ alie, kaj konservi min pura kaj ĉasta, spite al ĉiaj ensorĉaj povoj de la tero.

Tion dirinte, li ĵet-fermis la fenestron kaj, kun ĉagreno kaj aflikto, kvazaŭ sub la pezo de granda misfortuno, kuŝiĝis en sia lito, kaj tie ni lasos lin en la nuna momento, tial, ke nin vokas la eminenta Sancho, kiu volas fari sian debuton kiel gubernatoro.

[353] Juan de Mena, vivinta en la 15-a jarcento. La citita verso apartenas al lia verko *Laberinto de Fortuna*.

[354] El la Biblio (1 Korintanoj, 7,31).

Ĉapitro 45

Pri kiel la granda Sancho Panza okupis la gubernatorecon de la insulo, kaj pri kiel li komencis regi

Ho konstanta eltrovanto de la antipodoj, torĉo de la mondo, okulo de la ĉielo, dolĉa skvanto de karaĵoj! Timbrio tie, Febo ĉi tie, arkisto pretere, kuracisto transe, patro de la poezio, inventinto de la muziko...^[355] vi, kiu ĉiam leviĝas kaj, malgraŭ la ŝajno, neniam sobiras! Mi turnas min al vi, ho suno (per kies helpo la homo naskas homon)^[356] kun la peto, ke vi favoru min kaj lumigu la obskuron de mia menso, por ke mi povu rakonti plej fidele la regadon de Sancho; ĉar, sen vi, mi sentas min hezita, febla kaj konfuza.

Mi diru do, ke Sancho, kun sia tuta eskorto, alvenis al vilaĝo loĝata proksimume de mil personoj, unu el la plej gravaj de la duklando. Oni diris al li, ke la loko nomiĝas insulo Barataria, eble ĉar la nomo de la vilaĝo estis Baratario, aŭ eble ĉar li atingis *barato*, t.e. tute senpene, la gubernatorecon. Kiam li alvenis al la pordego de la remparzonita vilaĝo, la magistrato bonvenigis lin, aŭdiĝis la sonoriloj, kaj la vilaĝanoj kondukis lin, inter ĝeneralaj elmontroj de jubilo kaj kun granda pompo, ĝis la ĉefa kirko por doni dankon al Dio. Poste, per burleskaj ceremonioj, oni transdonis al li la ŝlosilon de la vilaĝo kaj akceptis lin kiel konstantan gubernatoron de la insulo Barataria.

La kostumo, la barbo, la eta kaj grasa korpo de la nova gubernatoro vekis la admiron, ne nur de la homoj nesciaj pri la esenco de la afero, sed eĉ de la multaj personoj konantaj la sekreton. Fine oni kondukis lin de la kirko al la tribunalo,

sidigis lin sur la honoran seĝon, kaj la majordomo de la duko diris:

—Laŭ olda kutimo ĉi-tiea, sinjoro gubernatoro, la persono veninta okupi la gubernatorecon, devas respondi demandon iom komplikajn kaj implikajn, por ke la popolo povu juĝi kaj taksu, per la respondo, la saĝon de sia nova gubernatoro, kaj, sekve, ĝoji aŭ tristi pro lia alveno.

Dum la majordomo parolis, Sancho rigardis nombron da grandaj literoj skribitaj sur la muro kontraŭa al lia seĝo. Kaj, ĉar li ne sciis legi, li demandis kion signifas tiaj pentraĵoj sur la muro.

—Sinjoro, tie oni skribis kaj registris la tagon de la enoficiĝo de via moŝto en ĉi insulo, kaj la teksto diras: «Hodiaŭ, en ĉi monato de ĉi jaro, sinjoro don Sancho Panza enoficiĝis kiel gubernatoro de la insulo. Dum longaj jaroj li ĝin ĝuu!».

—Kiu estas nomata don Sancho Panza? —demandis la ŝildisto.

—Via moŝto —respondis la majordomo—, ĉar la ununura Panza veninta al ĉi insulo sidas nun sur tiu seĝo.

—Sciu, amiko —diris Sancho—, ke mi ne estas «don», kaj ke neniam ekzistis «dones»^[357] en mia familio. Mi nomiĝas nur Sancho Panza; Sancho nomiĝis mia patro, Sancho mia avo, kaj ili ĉiuj estis Panzas, sen aldono de «don» aŭ «doña». Kaj mi pensas, ke en ĉi insulo certe troviĝas pli da *dones* ol da ŝtonoj. Sed jam sufiĉas, Dio min komprenas, kaj se mia regado daŭros almenaŭ kvar tagojn, eble mi povos elsarki la *dones*, ĉar, se juĝi ilian egan nombron, ili certe tudas kiel moskitoj. Nu, la sinjoro majordomo faru sian demandon. Mi respondos laŭpove, senrigarde al tio, ĉu la popolo ĝojos aŭ tristos.

Ĉi-momente du viroj eniris en la tribunalon: unu en vesto de kampulo, kaj la alia en vesto de tajloro kaj kun tondilo en la mano. La tajloro diris:

—Sinjoro gubernatoro, mi kaj ĉi kamparano venas al via moŝto, ĉar hieraŭ ĉi bonulo prezentiĝis en mia butikio (kun la ŝuldata respekto mi devas informi, ke mi estas licencita tajloro, Dio benatu!), metis al mi en la manojn pecon da drapo kaj demandis: «Sinjoro, ĉu sufiĉas ĉi drapo por fari al mi unu ĉapon?». Mi mezuris la pecon kaj respondis jese. Puŝite de sia malico kaj de la mava reputacio de la tajloroj, li certe imagis (kaj mi trafe suspektis kion li imagis), ke mi volas proprigi al mi parton de lia drapo, ĉar li petis, ke mi bone vidu, ĉu el la peco mi povus fari du ĉapojn. Mi divenis lian penson kaj respondis jese; kaj li, persistante en sia damnita ideo, aldonis ĉapon post ĉapo, kaj mi jeson post jeso, ĝis la nombro kvin. Kaj antaŭ nur unu momento, li revenis al mia butikio por preni ilin. Nu, mi volas doni al li la ĉapojn, sed li rifuzas pagi al mi la laboron, kaj eĉ postulas, ke mi redonu al li la drapon aŭ ties valoron.

—Ĉu tio estas vera, frato? —demandis Sancho.

—Jes, sinjoro —respondis la kampulo—. Sed via moŝto igu lin montri la kvin ĉapojn.

—Volonte —diris la tajloro. Kaj el sub sia mantelo li eltiris la manon kun kvin ĉapetoj sur la pintoj de la fingroj.

—Jen la ĉapoj menditaj de ĉi bonulo —daŭrigis la tajloro—, kaj mi ĵuras je Dio kaj je mia animo, ke mi proprigis al mi neniom el la drapo: ekspertoj ekzameni mian laboron kaj ili juĝu.

La ĉeestantoj ridis je la granda nombro da ĉapoj kaj je la stranga naturo de la afero. Sancho iom meditis kaj fine diris:

—Ŝajnas al mi, ke ĉi proceso bezonas, ne longan pristudon, sed tujan juĝon de saĝa homo. Mi verdiktas do, ke la tajloro ricevu neniom por sia laboro, kaj ke la kampulo perdu la drapon; la ĉapojn oni donacu al la enkarcerigitoj... kaj punkto.

La decido de Sancho igis la ĉeestantojn ridi, sed fine, oni faris kion la gubernatoro ordonis.

Poste prezentiĝis du olduloj: unu portis kanon anstataŭ bastono, kaj la alia diris al Sancho:

—Sinjoro, antaŭ kelkaj tagoj mi pruntis al ĉi bonulo dek orajn eskudojn por fari al li favoron kaj servon, kun la sola kondiĉo, ke li redonus ilin al mi, kiam miilin petus. Pasis multaj tagoj, sen ke mi postulus la redonon de la eskudoj, ĉar mi ne deziris meti lin en embarason pli grandan ol tiu, kiun li suferis, kiam li prunteprenis la monon. Sed, ĉar ŝajnis al mi, ke li tute ne zorgis pri la ŝuldo, mi petis lin, ne unu fojon, sed multajn, ke li pagu. Tamen, li ne nur ne pagas, sed eĉ asertas, ke mi neniam pruntis al li la eskudojn, aŭ ke li redonis ilin al mi. Mi ne havas atestantojn de la prunto, nek de la redono, ĉar ĉi lasta neniam okazis. Mi dezirus, ke via moŝto igu lin ĵuri, kaj se li ĵurus, ke li kvitiĝis kun mi, mi konsiderus lian ŝuldon repagita ĉi tie kaj antaŭ Dio.

—Kion vi respondas al tio, vi, bonulo kun la kano? — demandis Sancho.

—Sinjoro, mi konfesas, ke li pruntis al mi la eskudojn, kaj tial, ke li pretas akcepti mian ĵuron, mi ĵuros, ke mi ilin redonis al li vere kaj efektive. Bonvolu klini al mi vian vergon.^[358]

La gubernatoro klinis la vergon, la olda cedis la bastonon, kiu ŝajnis ĝeni lin, al la alia oldulo, metis la manon sur la

krucon de la vergo kaj deklaris, ke li vere ricevis prunte dek eskudojn, sed ke li repagis ilin en la propran manon de la plendanto, kaj ke ĉi lasta, sendube forgesinta la redonon, insiste petis fojon post fojo la eskudojn.

Ĉe tio, la granda Sancho demandis al la kreditoro, kion li respondas al la asertoj de sia kontraŭulo. La demandito deklaris, ke sendube lia debitoro diras la veron, ĉar li opinias lin honesta kristano; ke rilate al li mem, certe li forgesis kiel kaj kiam la alia redonis la monon, kaj ke de nun li neniam petos lin repagi.

La debitoro reprenis sian bastonon kaj eliris el la tribunalo kun klinita kapo. Sancho, vidinte la akuziton foriri senplie, kaj rimarkinte la paciencon de la plendanto, klinis la kapon super la brusto, metis la pinton de la montra fingro inter la brovoj kaj la nazo, tenis sin pensema ioman tempon, levis la kapon kaj ordonis, ke oni rekonduku antaŭ li la oldulon kun la kano.

Tion oni faris, kaj Sancho turnis sin al li, dirante:

—Cedu al mi vian bastonon, amiko. Mi bezonas ĝin.

—Tre volonte —respondis la olda—. Jen ĝi, sinjoro.

Tiam Sancho prenis la bastonon, transdonis ĝin al la alia oldulo kaj diris:

—Foriru, kaj Dio vin akompanu. Vi estas jam repagita.

—Ĉu vere, sinjoro? Ĉu ĉi kano valoras dek orajn eskudojn?

—Jes —respondis la gubernatoro—. Se ne, mi estas la plej granda azeno de la mondo. Kaj nun ni vidos, ĉu mi ne havas sufiĉe bonan kapon por regi tutan reĝolandon.

Tiam li ordonis, ke la kanon oni disrompu tie, antaŭ la publiko. Oni tion faris, kaj en la interno de la kano aperis dek oraj eskudoj. La ĉeestantoj profunde miris kaj rigardis sian gubernatoron kiel novan Salomonon.

Oni demandis al li, kiamaniere li deduktis ke la dek eskudoj kuŝis en la bastono, kaj li respondis, ke li vidis la akuziton cedi la kanon al la plendanto, ĵuri, ke la monon li redonis vere kaj efektive en la alies manon, kaj tuj poste repreni la kanon. Kaj ĉio ĉi igis la ŝildiston suspekti, ke la mono troviĝis en la interno de la dirita kano. Li aldonis, ke ĉi ekzemplo pruvis, ke la regantoj, eĉ se stultaj, eble ricevas inspiron de Dio; ke krome, iam li aŭdis la pastron de sia vilaĝo rakonti kazon similan, kaj ke li havas tiel grandan memoron, ke se li ne forgesus kion li ne deziras reteni en sia kapo, ne ekzistus en la insulo memoro komparebla kun la lia.

Fine la du olduloj foriris: unu hontoplena, kaj la alia kun sia mono. Kaj la ĉeestantoj plu miris, dum la persono ŝarĝita noti la vortojn, farojn kaj gestojn de Sancho tute perpleksis, ĉar li ne sciis, kiel juĝi kaj priskribi lin: ĉu saĝa, ĉu stulta.

Apenaŭ finiĝis ĉi proceso, kiam eniris en la tribunalo virino forte alkroĉita al viro en kostumo de riĉa posedanto de gregoj. Ŝi kriadis, dirante:

—Justecon al mi, sinjoro gubernatoro, justecon! Kaj se mi ne trovos ĝin sur la tero, mi ĝin serĉos en la ĉielo. Sinjoro gubernatoro mia, ĉi mava viro prenis min meze de la kamparo, misuzis mian korpon kaj lasis min kiel ŝiritan ĉifonon. Ve al mi! Li rabis de mi kion mi gardis kaj defendis dum pli ol dudek tri jaroj, dura kiel kork-arbo, kontraŭ maŭroj kaj kristanoj, konservante min tiel kompleta kiel salamandro en fajro^[359] kaj tiel pura kiel lano en rubuso. Kaj nun ĉi ulo venis taŭzi min per siaj lindaj manoj!

—Restas por vidi, ĉu la manoj de ĉi bravulo lindas aŭ ne —
diris Sancho.

Kaj turnante sin al la viro, li demandis, kion li obĵetas al la plendo de la virino. Plena de embaraso, la akuzito respondis:

—Sinjoro, mi estas povra posedanto de porkoj (oni pardonu al mi la esprimon) kaj en la mateno, post ol mi vendis kvar por apenaŭ iom pli da mono ol ili valoris, kaŭze de akcizoj kaj aliaj aĉaj diskontoj, mi eliris el ĉi vilaĝo ale al mia hejmo. Tiam mi renkontis sur la vojo ĉi bonan virinon, kaj la diablo, kulpanto de ĉiaj implikoj kaj komplikoj de la mondo, dekretis, ke ni pariĝu; mi pagis al ŝi sufiĉe, sed ŝi, ne kontenta ankoraŭ, kroĉiĝis al mi kaj trenis min ĉi tien. Dirante ke mi perfortis ŝin, ŝi mensogas, kaj tion mi ĵuras, aŭ ĵuros siamomente. Kaj jen la tuta vero, kompleta ĝis la lasta joto.

Tiam la gubernatoro demandis lin, ĉu li havas kun si iom da mono arĝenta. Li respondis, ke li gardas sub la ĉemizo proksimume dudek dukatojn en leda burso. Sancho ordonis lin elpreni la burson kaj enmanigi ĝin al la plendantino, kion li faris tremante. La virino kaptis la saketon, riverencis milfoje, petis Dion konservi la vivon kaj sanon de la sinjoro gubernatoro pro ties favoroj al forlasitaj orfinoj kaj puceloj, kaj eliris el la tribunalo kun la burso forte tenata per la du manoj, kvankam unue ŝi enrigardis en ĝin por vidi, ĉu efektive, estas arĝentaj la dukatoj.

Apenaŭ ŝi eliris, Sancho turnis sin al la gregoposedanto, kies koro kaj larmoplenaj okuloj sopiris la burson, kaj diris:

—Persekutu la virinon, amiko, prenu de ŝi la burson, perforte se necese, kaj revenu ĉi tien kun ŝi.

Sancho alparolis nek al stulta nek al surda, ĉar la viro, rapide kiel fulmo, pafis sin for por plenumi la ordonon. La

ĉeestantoj streĉe atendis la finon de la sceno, kaj iom poste, revenis la viro kaj la virino pli forte kunkroĉitaj ol en la unua fojo. Ŝi tenis la jupon levita, kun la burso en la faldo, kaj la viro penadis ĝin forpreni, sed li absolute fiaskis en siaj klopodoj: tiel energie defendis ĝin la virino, kiu kriis dirante:

—Justecon al mi! Justecon de Dio kaj de la homoj! Vidu via moŝto, sinjoro gubernatoro, la senhonton kaj aŭdacon de ĉi kanajlo! Meze de la vilaĝo, meze de la strato, li ĵetis sin sur min por rabi la burson, kiun vi donis al mi.

—Ĉu li ĝin prenis? —demandis la gubernatoro.

—Kion? Preni? —respondis la virino—. Oni forprenus eĉ mian vivon, sed ne la burson! Ne igu min ridi: por ungi min, necesus aliaj katoj, ne ĉi kraĉinda kaj naŭza ulo! Tenajloj kaj marteloj, maleoj kaj ĉiziloj ne sufiĉus por elŝiri la burson el miaj manoj. Eĉ ne la ungegoj de leono! Prefere fordoni la animon el inter la ŝiroj de la karno!

—Ŝi pravas —diris la viro—. Mi deklaras min elĉerpita kaj venkita kaj konfesas, ke mi ne havas sufiĉan forton por forpreni de ŝi la burson.

Kaj li lasis ŝin libera.

Tiam Sancho diris al la virino:

—Virta kaj brava sinjorino, bonvolu cedi al mi la burson.

Ŝi senhezite enmanigis ĝin al la gubernatoro, li ĝin redonis al la viro kaj diris al la forta, sed ne perfortita virino:

—Fratino, se por defendi vian personon vi montrintus la saman kuraĝan spiriton, aŭ eĉ nur la duonon de la energio, kiun vi montris por defendi la burson, la forto mem de Herkulo ne povus vin submeti. Foriru, la diablo vin prenu, kaj

ne restu en ĉi insulo, nek en la distanco de dudek mejloj ĉirkaŭe, se vi ne volas ricevi la punon de ducent vergoj. Foriru tuj, mi diras, vi senhonta, trompa-langa, ĉarlatana!

La virino teruriĝis kaj, ĉagrenita kaj kap-klina, foriris, dum la gubernatoro diris al viro:

—Amiko, iru pace al via vilaĝo kun via mono, kaj de nun, se vi ne volas ĝin perdi, zorgu ne havi la kapricon pariĝi kun la unua virino videbla sur la vojo.

La viro dankis lin embarasite kaj honteme kaj foriris. Kaj la ĉeestantoj miris denove pro la saĝaj decidoj de la nova gubernatoro, kies kronikisto ĉion notis kaj poste skribis al la duko, kiu tre senpacience atendis lian informon.

Kaj restu ĉi tie la bona Sancho, ĉar lia mastro, agitata de la muziko de Altisidora, meritas nian tujan atenton.

[355] En ĉi alvoko, Cervantes aludas diversmaniere al la suno, aŭ Apolono, ankaŭ nomita Febo kaj Timbrio: arkisto, ĉar li mortigis per sagoj, interalie, la filon de Nioba; kuracisto, ĉar li kreis la medicinon kaj generis Eskulapon; inventinto de la muziko, ĉar li elpensis la citron; ktp. Pri «la dolĉa skuanto de karafoj» oni sciu, ke en la 17-a jarcento oni uzis kuprajn karafojn kaj kovris ilin per neĝo por refreŝigi la akvon aŭ vinon en ilia interno. Kaj pro la varmo de la suno, oni ofte devis movi ilin por trinki aŭ por agiti la likvaĵon.

[356] Ĉar, sen la suno, ne ekzistus periodaj rikoltoj kaj, sekve, ankaŭ ne homoj.

[357] En la hispana, pluralo de «don».

[358] Dum la plenumo de siaj funkcioj, la reprezentantoj de la justico portis, kiel simbolon de aŭtoritato, vergon aŭ bastoneton, en kies supra parto ordinare oni strekis krucon.

[359] Iam oni kredis, ke la salamandroj estas imunaj kontraŭ la flamoj.

Ĉapitro 46

Pri la terura ŝoko ricevita de don Quijote en pandemonio kata kaj tintilega, dum sekvis sia kurso la ama sopirado de la pasia Altisidora

Ni lasis la grandan don Quijote en la momento kiam la muziko de la amfrapita Altisidora vekis en li mil pensojn. Li enlitiĝis kun ili kaj, kvazaŭ puloj, ili tute ne lasis lin dormi aŭ trankvili: kaj al tio miksiĝis lia zorgo pri la ŝirita ŝtrumpo. Sed tial, ke la tempo rapidas kaj ne ekzistas foso kapabla ĝin deteni, la horoj flugis kiel kavalira ĉevalo, kaj tre baldaŭ alvenis la mateno. Tion vidinte, don Quijote saltis de la mola plumo-lito, vigle surmetis sian ĉaman veston; poste, por kaŝi la ruinon de la ŝtrumpo, la paron da longaj botoj, kaj, fine, la mantelon skarlatan kaj ĉapon el verda veluro garnita per arĝenta pasamento; pendigis de la ŝultro sian balteon kun la bona kaj akra glavo, prenis grandan rozarion, kiun li ĉiam portis kun si, kaj, kun afekte majesta irmaniero, direktis sin al la antaŭĉambro, kie la gedukoj, jam en formala vesto, ŝajne atendis lin. Sed, kiam li iris laŭlonge de galerio, tie atendis lian pason Altisidora kaj ŝia amikino, kaj tuj kiam la pucelo vidis la hidalgon, si simulis sveni kaj lasis sin fali sur la alian junulinon, kiu subtenis ŝin kaj faris movon delaĉi ŝian korsaĵon.

Tion vidinte, don Quijote proksimiĝis al la knabinoj kaj diris:

—Mi konas la kaŭzon de ĉi speco de akcidentoj.

—Mi ne —respondis la amikino—. Altisidora estas la pucelo pli sana de ĉi domo, kaj, de kiam mi ŝin konas, eĉ ne unu fojon mi aŭdis ŝin plendeti. La misfortuno akompanu la

vagantajn kavalirojn de la mondo, se ili estas tiel sendankaj kiel vi. Bonvolu foriri, sinjoro don Quijote. Ĉi kompatinda knabino ne retrovos la konscion, tiel longe kiel vi restos ĉi tie.

—Bonvolu aranĝi, ke ĉi-nokte oni enportu liuton en mian ĉambron, kaj mi laŭpove konsolos ĉi afliktitan pucelon: ĉar, en la komenco de la amo, prompta disrevigo estas efika medicino —diris la hidalgo.

Kaj tuj poste, don Quijote foriris, por ne esti rimarkata de eventualaj spektantoj. Sed, apenaŭ li malaperis, la sveninta Altisidora rekonsciiĝis kaj diris al sia kunulino:

—Konvenos provizi lin per liuto. Don Quijote sendube volas ludi al ni, kaj lia muziko, ĉar lia, sonos ne mave.

Tuj poste ili iris informi al la dukino pri la okazaĵo kaj pri la peto de don Quijote. Oni atendis la nokton kun senpacienco kaj anticipa plezuro, kaj ĝi fine alvenis tiel rapide kiel antaŭe la tago, kiun la gedukoj pasigis en plezurigaj konversacioj kun don Quijote; kaj en ĉi sama tago la dukino efektive sendis unu el siaj paĝioj —la ludinton, en la arbaro, de la rolo de la ensorcita Dulcinea— al Teresa Panza, kun la letero de Sancho kaj kun sako da vestaĵoj, kiun la ŝildisto liveris, por ke oni ĝin portu al ŝia edzino. Cetere, la dukino rekomendis al la paĝio, ke li bone observu ĉion por fari ĉe la reveno longan raporton pri sia vizito al Teresa Panza.

Fine sonis la dekunua horo nokte. Don Quijote eniris en sian ĉambron, trovis tie la liuton, agordis ĝin, apertis la fenestron, sentis la ĉeeston de homoj en la ĝardeno, pinĉis la kordojn de la instrumento, reagordis ĝin kiom li povis, kraĉis, gorĝobruis kaj per voĉo raŭketa sed ĝustatona komencis kanti ĉi romancon, kiun li mem komponis en la tagaj horoj:

Di' Amoro tiel fortas,
ke renversas li l' animon,
kaj por tio li sin helpas
de la plezur-ama pigro.

Esti ĉiam okupata
kaj labori per kudrilo
taŭgas kiel antidoto
kontraŭ blinda am-deziro.

La puceloj virtaj, puraj,
dezirantaj edziniĝon
havas ĉaston kiel doton,
kiel plej valoran riĉon.

La sinjoroj korteganoj
kaj vagantaj kavaliroj
flirtas kun frivolaj damoj
sed edziĝas al virginoj.

Kelkaj amoj tre similas
al la sun' en ties iro:
daŭras nur malmultaj horoj
de l' komenco ĝis la fino.

Tia efemera amo,
ĉiam en konstanta migro,
povas ne sur koron stampi
daŭran kaj profundan bildon.

Meti bildon sur alian
estas ago sen utilo:
apud la belec' unua,
al la dua mankas brilo.

Dulcinea del Toboso

markis sin en mia sino
tiel forte, ke ne eblas
ŝin forigi per ektiro.

La firmeco de l' amantoj
estas plej valora virto,
kaj miraklojn povas fari
por ilia am-inklino.

Don Quijote atingis ĉi parton de sia romanco, aŭskultata de la gedukoj, Altisidora kaj preskaŭ la tuto el la ceteraj kastelanoj, kiam subite, de galerio ĝuste super la fenestro de don Quijote oni descendigis ŝnuron kun pli ol cent tintilegoj al ĝi alligitaj kaj, tuj poste, el granda sako oni elskuis malsupren grandan nombron da katoj kun pli etaj tintiloj ligitaj al ties vosto.

Tiel grandan bruon faris la tintilegoj kaj la miaŭoj de la katoj, ke la gedukoj, kvankam ili mem elpensis la serĉon, konsterniĝis, dum don Quijote preskaŭ kolapsis de timo. Kaj okazis, ke du tri katoj enfalis tra la fenestro kaj, kvazaŭ legio da senbridaj diabloj, komencis freneze impeti ĉirkaŭ la ĉambro. Klopodante eskapi, la katoj renversis kaj estingis la kandelojn tie brulantajn, kaj dume oni ne ĉesis movi supren suben la ŝnuron kun la tintilegoj, ĉe la stuporo de la pli granda parto de la kastelanoj, nesciaj pri la vera karaktero de la incidento. Fine don Quijote stariĝis, elingis la glavon kaj komencis svingi ĝin tra la fenestro, kriante:

—For de ĉi tie, perversaj sorĉistoj! For, mizeraj kanajloj! Mi estas don Quijote de La Mancha, kaj viaj malignaj maĥinacioj povas nenion kontraŭ mi!

Tiam li frontis al la katoj, kuregantaj ankoraŭ tra la ĉambro, kaj ellasis kontraŭ ilin pluvon da hako. La bestoj kun la escepto de unu fine sukcesis eskapi tra la fenestro kaj la

krado, sed la restanta, premata en angulon pro la svingoj de la glavo, saltis sur lian vizaĝon kaj kroĉiĝis al lia nazo per ungoj kaj dentoj, tiel, ke la hidalgo muĝis de doloro.

Aŭdante lin, la gedukoj, sen bone kompreni la kaŭzon de liaj krioj, rapidis al lia ĉambro, apertis la pordon per universala ŝlosilo kaj trovis, ke la povra kavaliro luktas kun sia tuta forto por deŝiri katon de sia vizaĝo. Ili eniris kun lumiloj, kaj la duko, antaŭ ĉi batalo inter du malamikoj tiel neegalaj, proksimiĝis por apartigi ilin. Sed don Quijote kriis.

—Oni ne tuŝu ĝin! Lasu min lukti sola kontraŭ ĉi demona sorĉisto! Mi mem instruos al li kion signifas alfronti la kavaliron don Quijote de La Mancha!

Sed la kato, senrigarde al liaj minacoj, siblis kaj teniĝis ankoraŭ forte kroĉita, ĝis fine la duko detiris ĝin kaj ĝin ĵetis tra la fenestro. Don Quijote elpaŝis el la batalo kun la vizaĝo strekita per gratovundoj kaj kun la nazo en ne tre bela stato, sentante profundan ĉagrenon, ĉar oni ne lasis lin fini sola sian ferocan duelon kontraŭ tiel fripona sorĉisto. Oni ordonis alporti iom da oleo de Aparicio,^[360] kaj Altisidora mem, per siaj neĝe blankaj manoj, bandaĝis la vizaĝon de la hidalgo. Kaj, bandaĝante lin, ŝi diris softe:

—Ĉi misfortunoj falas sur vin, ŝton-kora kavaliro, kiel puno pro via obstino kaj sensenteco. Dio volu, ke Sancho, via ŝildisto, forgesu vipi sin, por ke via amata Dulcinea neniam liberiĝu de sia ensorĉo, kaj por ke vi neniam havu plezuron kun ŝi, nek prenu ŝin al la nupto-lito, almenaŭ dum mi, via adorantino, vivos.

Al tio don Quijote respondis eĉ ne unu vorton kaj nur elpuŝis profundan suspiron. Poste li kuŝiĝis sur la lito kaj dankis la gedukojn pro ties bona intenco helpi lin, kvankam, —li aldonis— li tute ne timis tiun friponan bandon da katoj-

sorĉistoj kun tintiloj. La gedukoj lasis lin ripozi kaj eliris el la ĉambro afliktitaj pro la mavaj sekvoj de la serĉo. Ili ne imagis, ke ĉi aventuro kostus tiel kare al don Quijote: li devis kuŝi kvin tagojn en la lito, sen forlasi la ĉambron, kaj tie okazis al li alia aventuro pli agrabla ol ĉi lasta. Sed lia historiisto ne volas ĝin rakonti nun, ĉar li devas reveni al Sancho Panza, tiam reganta la insulon kun diligento kaj sprito.

[[360](#)] Temas pri oleo por kuraci vundojn, preparita de Aparicio de Zubia, en la 16-a jarcento, per tre multekostaj ingrediencoj.

Ĉapitro 47

Kie oni plu rakontas pri la konduto de Sancho Panza en ties gubernatora posteno

Rakontas la historio, ke oni kondukis Sanchon el la tribunalo al luksa palaco, kie, en granda salono, staris superba tablo riĉe primetita. Ĉe lia eniro en la salonon, aŭdiĝis pluraj klarionoj, kvar paĝioj prezentis al li akvon en vazo por la man-lava ceremonio, kaj Sancho ĝin plenumis kun granda soleno. La muziko ĉesis, kaj li sidiĝis ĉe la tablo-kapo, ĉar nur tie vidiĝis manĝilaro kaj seĝo. Venis al lia flanko, kaj tie restis piede, unu viro (kuracisto, kie poste vidiĝis) kun barta vergeto en la mano. Oni delevis tre blankan kaj riĉan tukon, kiu kovris fruktojn kaj grandan nombron da pladoj kun diversaj manĝoj. Alia viro, ŝajne studento, benis la tablon, kaj unu paĝio nodis al la kolo de Sancho specon de punta bavo-tuko. Alia viro, funkcianta kiel butlero, metis pladon da fruktoj antaŭ la gubernatoro, sed apenaŭ li enbuŝigis peceton, kiam la doktoro verge tuŝis pladon, kaj oni ĝin formetis kun eksterordinara rapido. Tiam la butlero prezentis al li novan pladon kun alia manĝo, sed antaŭ ol Sancho povus atingi kaj gustumi ĝin, la vergo ĝin tuŝis, kaj unu paĝio forlevis ĝin rapide kiel la antaŭa paĝio la fruktojn.

Ĉe tio Sancho stuporis kaj, rigardante la ĉeestantojn, demandis, ĉu la manĝo-horo devus transformiĝi en ian specon de ĵonglado.

—Oni devas manĝi, sinjoro gubernatoro —respondis la vergulo—, konforme al la moroj kaj kutimoj de aliaj insuloj regataj de gubernatoroj. Mi, sinjoro, estas kuracisto, kaj oni pagas min, por ke mi zorgu pri la gubernatoro de ĉi insulo;

lian sanon mi atentas eĉ pli ol la mian, studante tage kaj nokte, kaj rimarkante lian korpan konstitucion, por ke mi povu senerare kuraci lin, se lin trafus malsano. Kaj mia ĉefa tasko konsistas en tio, ĉeesti al liaj diversaj manĝoj, lasi lin manĝi kion mi opinias konvena, kaj formeti de li kion mi konsideras mava kaj noca al lia stomako. Tial mi ordonis retiri la pladon da fruktoj, ĉar la fruktoj tro humidas; kaj ankaŭ la alian pladon mi prohibis pro ties troa varmo kaj abundo de spicoj, kiuj ekscitas la soifon. Sciu, ke la persono ofte trinkanta konsumas kaj detruas la *humidan radikalon*, t.e. la esencon de la vivo.

—Se tiel —diris Sancho—, la plado de rostitaj perdrikoj tie videbla ne farus al mi damaĝon. Ili ŝajnas tre bone kondimentitaj.

—La sinjoro gubernatoro ne manĝos ilin dum mi estos viva.

—Kial ne? —demandis Sancho.

—Ĉar nia majstro Hipokrato, poluso kaj lumo de la medicino, diras en unu el siaj aforismoj: *Omnis saturatio mala perdicis autem pessima*,^[361] kio signifas, ke ĉia supersatiĝo danĝeras, sed pleje la supersatiĝo per perdrikoj.

—Tiam, sinjoro doktoro —diris Sancho—, montru, inter la pladoj de ĉi tablo, la plej konvenan kaj malplej nocan al mi, kaj permesu, ke mi ĝin manĝu, sen ke vi tuŝu ĝin per la vergo, ĉar, je la vivo de la gubernatoro (kaj Dio longe gardu min!) mi mortas de malsato, kaj rifuzi al mi la manĝon kaŭzos, malgraŭ la opinioj de la sinjoro doktoro, ne la plilongigon, sed la finon de mia vivo!

—Mi faros laŭ via plaĉo —respondis la kuracisto—. Mi konsilas do al via moŝto, ke vi ne donu atenton al la stufitaj kunikloj tieaj, ĉar ilia viando apenaŭ digesteblas. La

bovidaĵon ĉi-flankan vi povus iomete gustumi, se ĝi ne estus rostita kaj kondimentita. Sed en ĝia nuna stato ne tuŝu ĝin.

—Tamen ĉi alia pladego fumanta —diris Sancho— ŝajnas al mi miksita stufaĵo^[362], kaj en ĝi, pro la diverso de ĝiaj ingrediencoj, certe mi trovos ion konvenan kaj bongustan.

—*Absit!*^[363] —ordonis la kuracisto—. Forĵetu de vi tiel eraran ideon! Ne ekzistas en la mondo pli mava manĝo ol miksita stufaĵo. Ĝin konsumu la kanonikoj, la direktoroj de kolegioj kaj ĉeestantoj al la nuptoj de kampuloj, sed ĝi ne aperu sur la gubernatoraj tabloj, kie devas montriĝi nur rafinitaj delikataĵoj, pro la simpla motivo, ke ĉiam kaj ĉie la rimedoj simplaj estas preferataj al la kunmetitaj, tial, ke per la simplaj oni ne povas erari, dum per la aliaj ekzistas la eblo fari mison, se oni ŝanĝas la proporcion de la diversaj ingrediencoj. Mi sincere opinias, ke po konservi kaj plibonigi sian sanon, la sinjoro gubernatoro devas manĝi nur centon da vafletoj kaj kelke da mincaj tranĉaĵoj el cidonia ĵeleo, ĉar ili tre bonas al la stomako kaj al la digesto.

Tiom aŭdinte, Sancho retrokliniĝis sur la dorson de la seĝo, fikse rigardis la kuraciston, kaj kun serioz-tona voĉo demandis al li, kiel li nomiĝas, kaj kie li studis. Al tio respondis la kuracisto:

—Mi, sinjoro gubernatoro, nomiĝas doktoro Pedro Recio de Agüero, naskiĝis en la vilaĝo Tirteafuera, kiu situas je la dekstra mano sur la vojo de Caracuel al Almodóvar del Campo. Kaj la diplomon de doktoro mi ricevis ĉe la universitato de Osuna.

Al tio respondis Sancho, ruĝa de kolero:

—Nu, sinjoro doktoro Pedro Recio de mava Agüero,^[364] diplomito ĉe Osuna, naskiĝinta en la vilaĝo Tirteafuera, kiu

situas je la dekstra mano, laŭ la vojo de Caracuel al Almodóvar del Campo: for de ĉi tie, tuj! Se ne, mi ĵuras, ke mi prenos dikan bastonon kaj ĝiseksterme pistos vin kaj la ceterajn doktoroj de la insulo, almenaŭ la sensciajn; ĉar, rilate al la kuracistoj kompetentaj, prudentaj kaj saĝaj, mi ilin respektos kaj honoros kiel diajn personojn. Kaj mi ripetas, ke Pedro Recio jam foriru de ĉi tie; se ne, mi prenos ĉi seĝon, kie mi sidas, kaj ĝin frakazos sur lian kapon. Kaj se oni min akuzus pri perforto, mi dirus kiel sinpravigon, ke mi faris bonan servon al Dio, eliminante unu el la mavaj kuracistoj, kiuj estas kvazaŭ buĉistoj de la civitanoj. Tiel do, aŭ donu al mi iom da manĝo, aŭ oni reprenu de mi la guberantorecon, ĉar ofico nekapabla provizi manĝon al sia plenumanto, valoras eĉ ne unu figon.

La doktoro alarmiĝis ĉe la furiozo de la gubernatoro kaj volis forgliti el la ĉambro, sed tiam aŭdiĝis la sono de kuriera korno en la strato. La butlero elrigardis tra la fenestro kaj returnis sin, dirante:

—Venas mesaĝisto de la sinjoro duko. Certe li alportas gravan depeŝon.

La kuriero enpaŝis, ŝvitoplena kaj agitata, eltiris el sub sia ĉemizo sigelitan mesaĝon, metis ĝin en la manojn de la gubernatoro, kaj Sancho ĝin transdonis al la majordomo, ordonante, ke li legu la adreson. Ĝi tekstis jene: «Al don Sancho Panza, gubernatoro de la insulo Barataria, en liajn proprajn manojn, aŭ en la manojn de lia sekretario».

Tion aŭdinte, Sancho demandis:

—Kiu estas ĉi tie mia sekretario?

Unu el la ĉeestantoj respondis:

—Mi, sinjoro, ĉar mi scias legi kaj skribi, kaj krome, mi estas vasko.^[365]

—Kun via vaskeco —diris Sancho— vi povus esti sekretario de al imperiestro mem. Apertu la mesaĝon kaj legu ĝin.

La ĵus sin nomita sekretario obeis, legis la skribaĵon al si kaj deklaris, ke temas pri afero private traktenda. Sancho ordonis, ke la aliaj forlasu la ĉambron, kaj ke tie restu nur la majordomo kaj la butlero. La ceteraj foriris kun la kuracisto, kaj tiam la sekretario voĉe legis la leteron, kies teksto diris:

Mi ricevis la informon, sinjoro don Sancho Panza, ke certaj malamikoj miaj kaj de via insulo, lanĉos kontraŭ ĝin furiozan atakon, kvankam oni ne scias en kiu nokto. Konvenas do vigili kaj sin teni tre garde, por ke oni ne surprizu vin. Mi ricevis ankaŭ la informon, per fidindaj spionoj, ke kvar personoj, alivestitaj, ĉar ili timas vian sagacon, englitis en la insulon kun la intenco preni de vi la vivon. Tenu la okulojn apertajn bone observu kiu do proksimiĝas paroli al vi, kaj manĝu nenion al vi proponatan. Mi certe helpos vin, se vi troviĝos en danĝera situacio. Kaj sendube vi kondutos, kiel oni esperas de via inteligento. En ĉi loko, la deksekan de aŭgusto, je la kvara matene. Via amiko, la duko.

Sancho stuporis, kaj la aliaj ŝajnis same stupori. Fine, turnante sin al la majordomo, li diris:

—Komence, jen kion ni devus fari tuj: enkarcerigi doktoron Recio, ĉar, se ajna persono volas min mortigi, tiu persono estas li; kaj krome, li volas, je mi mortu de malsato, morto plej lanta kaj terura.

—Tamen —intervenis la butlero— mi opinias, ke via moŝto devus manĝi nenion el ĉi tablo, ĉar ĝin preparis kelkaj

monaĥinoj kaj, kiel oni diras, la diablo sin kaŝas post la kruco.

—Tion mi ne diskutus —respondis Sancho—. Sed, por la nuna momento, oni donu al mi pecon da pano kaj kvar futojn da uvoj, ĉar ili ne povas enteni venenon. Vere, sen manĝi mi ne povas vivi, kaj se ni devas teni nin pretaj interveni en la bataloj nin minacantaj, necesas, ke ni nutru nin bone, tial, ke «la stomako portas la koron, ne la koro la stomakon». Kaj vi, sekretario, respondu al mia sinjoro la dukino, ke oni faros laŭ liaj ordonoj ĝis la lasta detalo; ankaŭ salutigu je mia nomo mian sinjorinon la dukinon, kaj diru, ke mi suplikas ŝin ne forgesi sendi per kuriero miajn leterojn kaj pakon al mia edzino Teresa Panza, ke mi konsideros tion granda favoro, kaj ke mi klopodos servi ŝin per mia tuta forto. Samtempe vi povas enmeti saluton por mia sinjoro don Quijote, ke li vidu, ke mi havas dankeman koron. Kaj vi, ĉar bona sekretario kaj bona vasko, laŭplaĉe aldonu kion vi opiniu konvena. Nun oni demetu ĉi tablotukon, donu al mi manĝon kaj mi alfrontos al ĉiaj spionoj, murdistoj kaj sorĉistoj intencantaj ataki min kaj mian insulon.

Ĉe tio enpaŝis paĝio kaj diris:

—Unu kampulo negocisto atendas transporde kaj deziras paroli al via moŝto pri tre grava afero, laŭ liaj asertoj.

—Vere stranga kazo —diris Sancho—. Ĉu ĉi negocistoj tiel stultas, ke ili ne vidas, ke la nuna horo ne konvenas por iliaj negocoj? Ĉu eble ni, gubernatoroj kaj juĝistoj, ne estas personoj el karno kaj ostoj? Kial oni ne lasas nin ripozi, almenaŭ la minimuman tempon necesan? Ĉu oni volas, ke ni konsistu el marmora ŝtono? Mi ĵuras je Dio kaj je mia konscienco, ke se ĉi gubernatoreco daŭros al mi (kaj mi suspektas, ke ĝi ne daŭros) mi disciplinos pli ol unu

negociston. Nun, diru al tiu bonulo, ke li envenu. Sed unue, oni certiĝu, ke li ne estas ia spiono aŭ unu el miaj murdistoj.

—Ne, sinjoro —respondis la paĝio—. Li ŝajnas vera bonulo. Aŭ mi scias nenion, aŭ li bonas kiel la bona pano.

—Oni devas tute ne timi —aldonis la majordomo—. Ni ĉiuj staras apud vi.

—Butlerero —demandis Sancho—. Ĉu mi ne povus manĝi nun, kiam forestas doktoro Pedro Recio, ion solidan kaj substancan, eĉ se nur pecon da pano kaj unu cepon?

—En la ĉi-vespera manĝo via moŝto povos ripari la nunan mankon kaj senti vin kontenta kaj pli ol kompensita — respondis la butlerero.

—La ĉielo volu tion —diris Sancho.

Tiam eniris la kampulo, viro tre bel-aspekta; kaj de mil mejloj oni povus vidi, ke li estas bona kaj honesta animo. Unue li demandis:

—Kiu estas ĉi tie la sinjoro gubernatoro?

—Kiu povus esti —respondis la sekretario—, se ne la sidanto sur la seĝo?

—Mi humiligas min antaŭ li —diris la kampulo.

Tuj sekve li genuiĝis kaj petis de Sancho lian manon por ĝin kisi. Sed Sancho rifuzis tion fari, kaj ordonis lin stariĝi kaj diri, kion do li volas. La kampulo obeis kaj diris:

—Sinjoro, mi estas kamparano el Miguel Turra, vilaĝo ses mejlojn for de Ciudad Real.

—Ha, jen alia Tirteafuera! —ekkriis Sancho—. Sed daŭrigu, frato, ĉar de mia flanko mi povas diri, ke mi tre bone konas Miguel Turra. Ĝi ne tre distancas de mia propra vilaĝo.

—Nu, bone, la afero estas, sinjoro —daŭrigis la kampulo—, ke, pro mizerikordo de Dio, mi edziĝis kun licenco kaj beno de la Sankta Eklezio Katolika Romana, kaj havas du filojn: la pli juna studas por fariĝi bakalaŭro, kaj la alia por licenciĝi. Mi estas vidvo, ĉar mia edzino mortis, aŭ pli ĝuste, ĉar ŝin mortigis fuŝa kuracisto, laksigante ŝin, kiam ŝi gravedis. Kaj se Dio volintus, ke ŝia infano normale naskiĝus kaj estus knabo, mi igus lin studi, ke li fariĝu kuracisto: tiel, li ne sentus envion al siaj fratoj, la bakalaŭro kaj la licenciito.

—Kaj se via edzino ne estus mortinta aŭ mortigita —diris Sancho—, nun vi ne estus vidvo, ĉu ne?

—Efektive, sinjoro, vi pravas.

—Nu, jen, ni progresas! —respondis Sancho—. Daŭrigu, frato, ne perdu la tempon. La nuna horo estas por dormi, ne por trakti aferojn.

—Sciu do —diris la kampulo—, ke mia filo, la estonta bakalaŭro, enamiĝis, en la sama vilaĝo, al juna pucelo nomita Clara Perlerina, filino de la riĉega kamparano Andrés Perlerino. Ĉi nomo Perlerino havas nenian genealogian originon kaj venas de tio, ke la membroj de ĉi familio estas paralizuloj kaj, por ke la nomo sonu pli bone, oni nomas ilin Perlerinos anstataŭ paralizuloj. Tamen, se diri la veron, la pucelo similas al orienta perlo, kaj, se oni rigardas ŝin de la dekstra flanko, ŝi ŝajnas kampara floro; sed de la liva, ŝi ne aspektas tiel bone, ĉar mankas al ŝi la tiuflanka okulo, kiu ŝi perdis kaŭze de variolo. Kaj, kvankam vidiĝas plena de grandaj kavetoj, la personoj, kiuj ŝin admiras, asertas, ke temas, ne pri kavoj, sed pri tomboj, kien falas la animoj de

ŝiaj amantoj. Ŝi estas tiel pur-ama, ke ŝia nazo suprentiriĝas, se tiel diri, kvazaŭ forkurante de la buŝo; malgraŭe, ŝi bele aspektas, ĉar ŝi havas grandan buŝon kaj, se ne mankus al ĝi dek aŭ dek du dentoj kaj molaroj, ĝi rangus inter la plej perfektaj. Pri ŝiaj lipoj mi ne scias kion diri: ili estas tiel mincaj kaj delikataj, ke, se eblus volvi lipojn, el ili oni povus fari bulon; sed tial, ke ili havas koloron diferencon de la kutima koloro de la lipoj, ili ŝajnas mirindaj, jaspitaj per bluo, verdo kaj purpuro. Kaj pardonu min, sinjoro gubernatoro, se mi detale pentras la trajtojn de la pucelo: finfine ŝi estos mia bofilino, mi ŝin tre amas, kaj ŝi ŝajnas bona al mi.

—Pentru laŭvole —diris Sancho—. Via pentrado tre plaĉas al mi kaj, se mi manĝintus, mi konsiderus vian portreton la plej bona deserto.

—La deserton mi priservos al vi siatempe^[366] —respondis la kampulo—. Kaj kredu min, sinjoro, se mi povus pentri ŝian eleganton kaj ŝian staturon, ili kaŭzus admiron. Sed fari tion ne eblas, ĉar ŝi sidas tute kurbiĝinta kaj buliĝinta, kaj ŝiaj genuoj tuŝas ŝian buŝon. Tamen, oni bone vidas ke, se ŝi povus stari, ŝia kapo atingus la plafonon. Kaj ŝi jam estus donita sian manon, en promeso de edziniĝo, al mia filo bakalaŭro, sed okazas, ke ŝi ne kapablas etendi ĝin pro ties kripleco; malgraŭ ĉio, per siaj ungoj longaj kaj kurbaĵoj ĝi montras sian belan kaj proporcian formon.

—Tre bone —diris Sancho—. Ni imagu, frato, ke vi jam pentris ŝin de la kapo ĝis la piedoj. Kaj nun, kion vi volas? Iru rekte al la afero, sen tiom da zigzagoj, devioj, aldonoj kaj remburaĵoj.

—Mi volus, sinjoro, ke via moŝto faru al mi la favoron doni al mi rekomendan leteron por la patro de la junulino, en kiu letero vi supliku lin, ke li bonvolu konsenti la celebron de ĉi geedziĝo, se konsideri, ke li kaj mi proksimume egalas ne

nur rilate al la mono, sed ankaŭ rilate al la donoj de la naturo, ĉar, verdire, sinjoro gubernatoro, mia filo estas posedata de la demono,^[367] kaj ne pasas unu sola tago, sen ke la malicaj spiritoj turmentu lin du tri fojojn. Iam li falis en la fajron de la kameno kaj havas la vizaĝon ŝrumpa kiel pergameno, kaj liaj okuloj estas iom tro larmaj kaj mukaj; sed li ĝuas anĝelan karakteron, kaj se li ne bategus sin mem per la pugnoj, li estus vera sanktulo.

—Ĉu vi volas ion plian, frato? —demandis Sancho.

—Ion plian mi deziras, sed ne kuraĝas ĝin mencii — respondis la kampulo—. Nu bone, ĉu konvene, ĉu ne konvene, mi eldiru ĝin, ke ĝi ne putru en mia brusto. Mi dezirus, sinjoro, ke via moŝto donu al mi tri cent aŭ ses cent dukatojn, kiel helpon al la doto de mia filo bakalaŭro; mi volas diri, por helpi lin fondi sian hejmon, ĉar finfine, li kaj lia edzino devos vivi per si mem, sen submetiĝi al la impertinento de la bopatroj.

—Se vi deziras ion kroman, diru ĝin. Ne permesu, ke la honto aŭ la timido senkuraĝigu vin.

—Ne, certe ne —respondis la kampulo.

Sed apenaŭ li aŭdis la respondon, la gubernatoro stariĝis, prenis la seĝon, kie li sidis ĝis tiam, kaj diris:

—Mi ĵuras je Dio, don kampulaĉo kruda kaj senhonta, ke se vi ne malaperos tuj el mia vido, mi frakazos kaj splitos vian kapon per ĉi seĝo! Filo de putino, fripono, pentristo de la diablo, ĉu vi venis ĉi-hore peti de mi ses cent dukatojn? Kie mi havas ilin, fetora? Kaj eĉ se mi ilin havus, kial mi devus doni ilin al vi? Pajaco, idioto, per kio tuŝas min Miguel Turra aŭ la tuta familio Perlerines? Jam forglitu, mi ripetas, ĉar alie, mi ĵuras je mia sinjoro la duko, mi faros kiel dirite. Sendube

vi estas, ne de Miguel Turra, sed ia malica fripono sendita ĉi tien de la infero por tenti min. Aŭskultu, kot-anima, ne pasis ankoraŭ unu tago kaj duono de kiam mi okupis la gubernatorecon, kaj vi pensas, ke mi posedas jam ses cent dukatojn!

La butleroj signis al la kamparano, ke li forlasu la ĉambron, kion li faris kapklina kaj ŝajne kun la timo, ke la gubernatoro fine plenumus sian minacon: tiel bele la farsulo sciis ludi sian rolon!

Sed ni deturnu nin de Sancho kaj ties kolero, regu la paco, kaj ni revenu al don Quijote, kiun ni lasis kun la vizaĝo bandaĝita kaj kuracata kaŭze de la kataj grat-vundoj. Lia resaniĝo daŭris ok tagojn, kaj en unu el ili okazis al li io, kion Cide Hamete promesas rakonti ĝuste kaj fidele, kiel li kutime faras rilate al la aferoj, eĉ plej sensignifaj, de ĉi historio.

[361] Latine. La aforismo, anstataŭ *perdicis* (perdrikoj) diras *panis* (pano). La doktoro modifas ĝin, por ĝin konformigi al la ŝerco.

[362] Manĝaĵo el poto en kiu oni kuiras samtempe multe da diversaj kaj bongustaj nutraĵoj. Ankaŭ tradukita en la ĉapitro 49-a de la dua parto per la neologismo «olapodrido», laŭ la hispana nomo «olla podrida» (laŭlitere: «putranta poto»).

[363] Latine: «ĝin ne tuŝu!», «abstinu de tio!».

[364] En la hispana, «agüero» signifas «aŭguro».

[365] En la epoko de Cervantes, la vaskoj estis preferataj por la postenoj de reĝaj sekretarioj pro sia kompetento kaj lojalo.

[366] Sendube ironia aludo al tio, ke, ĉe la fino de la konversacio, la kampulo petos de Sancho kvanton da mono.

[367] Oni ĝenerale kredis, ke en la epilepsiuloj sidas demonoj, kiuj kaŭzas la epilepsiajn konvulsiojn.

Ĉapitro 48

Pri tio okazinta al don Quijote kun doña Rodríguez, la duenjo de la dukino, kaj pri aliaj eventoj, indaj je mencio kaj eterna memoro

Profundan ĉagrenon kaj triston sentis la grave vundita don Quijote, kun la kapo bandaĝita, kaj la vizaĝo markita, ne de la mano de Dio, sed de la ungoj de kato: misfortunoj propraj al la vagantaj kavaliroj. Dum ses tagoj li ne aperis publike, kaj en la dirita tempo, kiam unu nokton li kuŝis sendorma, pensante pri siaj misfortunoj kaj pri la persekutado de Altisidora, li aŭdis, ke oni provas aperti per ŝlosilo la pordon de lia ĉambro, kaj li imagis tuj, ke la amo-frapita pucelo venas por elmeti al provo lian ĉaston kaj klopodi venki lian ŝuldatan fidelon al lia sinjorino Dulcinea de El Toboso.

—Ne —li diris per aŭdebla voĉo, kredante vera kion li imagis —. La plej granda belulino de la tero ne sufiĉos, por ke ĉesu adori la damon, kies bildon mi tenas stampita en la centro de mia koro kaj en la plej sekreta fundo de mia persono. Ĉu transformite en kampulinon cepomanĝan aŭ en nimfon de la ora rivero Tajo, okupatan teksu tolonojn per silkaj kaj oraj fadenoj, ĉu retenate de Merlín aŭ Montesinos en ajna loko, vi apartenas al mi, kaj mi estas via, kie ajn mi troviĝas.

En la sama momento, kiam li finis ĉi vortojn, la pordon oni apertis. La hidalgo starigis sin sur la lito, envolvite de la kapo ĝis la piedoj en peplomo el flava sateno, kun dormoĉapo sur la kapo, kaj kun la vizaĝo kaj la mustaĉo bandaĝitaj: la unua pro la grato-vundoj, kaj la dua por ke la lipharoj ne tro subenkurbiĝu. Kaj, en tia kostumo, li ŝajnis la plej eksterordinara fantomo imagebla. Li fiksis la rigardon

sur la pordon, kun ideo, ke li vidos eniri la afliktitan kaj amofrapitan Altisidora, sed tiam aperis ĉe la pordo ege respektinda duenjo kun blanka vualo plisita, tiel longa, ke ĝi kovris kaj volvis ŝin de la kapo ĝis la piedoj. Per la fingroj de la liva mano ŝi tenis luman kandelon, kaj per la dekstra ŝirmis sian vizaĝon, por ke la brilo de la flamo ne trafu al ŝi en la okulojn, garnitajn per tre grandaj okulvitroj. Ŝi paŝetis silente, per molaj piedoj.

Don Quijote rigardis ŝin de sia altano, kaj pensante, ĉe ŝia kostumo kaj ŝia silento, ke ŝi estas magiistino aŭ sorĉistino, kiu venas en tia vesto por fari al li damaĝon, li komencis krucosigni al si kun granda rapido. La vizito alproksimiĝis kaj, atinginte la mezon de la ĉambro, levis la rigardon kaj rimarkis, kiel haste sin krucosignas don Quijote; kaj se li timiĝis ĉe ŝia aspekto, ĝi same teruriĝis ĉe la lia, ĉar tuj kiam ŝi vidis lin tiel alta kaj flava, kun la peplomo kaj la bandaĝoj lin deformintaj, ŝi kriis, dirante:

—Jesuo! Kion mi vidas?

Ŝi skuiĝis de timo, la kandelo falis de sia mano, kaj, vidante sin subite en tenebro, ŝi sin turnis por foriri; sed, en sia alarmo, ŝi stumblis ĉe sia jupo kaj peze falis sur la plankon. Don Quijote, terurite, komencis krei:

—Mi ĵurpetas vin, fantomo, aŭ kio ajn vi estas, ke vi diru vian nomon kaj, ankaŭ, kion vi volas de mi. Se vi estas punata animo, tion konfesu al mi, kaj mi faros por vi ĉion eblan, ĉar mi estas kristana katoliko kaj klopodas fari bonon al ĉiuj: ĉi tial mi aliĝis al la ordeno de la vagantaj kavaliroj, kies devoj ampleksas eĉ tion, helpi la animon de la purgarorio.

La konsternita duenjo, aŭdante, ke oni ĵurpetas ŝin, taksis laŭ sia propra timo la timon de don Quijote, kaj kun voĉo flustra kaj aflikta, diris:

—Sinjoro don Quijote (se efektive via moŝto estas don Quijote), mi estas nek vizio nek fantomo, kiel certe vi pensis, sed doña Rodríguez, honora duenjo de mia sinjorino la dukino. Kaj mi venas al vi kun unu el la necesoj, kiujn via moŝto scias kontentigi.

—Diru, sinjorino doña Rodríguez —respondis don Quijote—. Ĉu eble vi venas kiel perantino de am-afero?. Se jes, mi devas informi vin, ke viaj klopodoj vanus, ĉar mi apartenas al la senegala belo de mia sinjorino Dulcinea de El Toboso. Unuvorte, sinjorino Rodríguez, se vi flankklaras kaj forgesas ĉian aman mesaĝon, vi povas denove ekbruligi vian kandelon kaj paroli kun mi ion ajn, laŭ via plaĉo kaj deziro, esceptante, kiel dirite, frivolaĵojn de lasciva karaktero.

—Sinjoro, mi ne farus tian rolon! —ekkriis la duenjo—. Oni bone vidas, ke via moŝto apenaŭ konas min. Mi ne havas ankoraŭ tiel maturan aĝon, ke mi limigu min al tiaj infanecaj peradoj. Dio laŭdatu, mia animo sidas en mia karno, kaj ĉiuj miaj dentoj kaj molaroj en mia buŝo, krom kelke da ili, jam perditaj kaŭze de la kataroj tiel komunaj en ĉi regiono de Aragón. Sed via moŝto atendu momenton: mi eliros ekbruligi la kandelon kaj tuj revenos rakonti miajn misfortunojn al vi, la riparanto de ĉiaj afliktoj de ĉi mondo.

Senplie ŝi eliris el la ĉambro, kie don Quijote, pensema kaj pli trankvila, restis atendente ŝian revenon. Sed baldaŭ, mil ideoj rilate al ĉi nova aventuro komencis boli en lia cerbo. Ŝajnis al li plej riproĉinde, ke li elmetis sin al la danĝero rompi la fidelecon, kiun li promesis al sia sinjorino, kaj diris en si:

—Ĉu eble la diablo, tiel lerta kaj subtila, volas nun trompi min pere de duenjo, kvankam li ne sukcesis per imperiestrinoj, reĝinoj, markizinoj kaj grafinoj? De multaj saĝaj personoj mi aŭdis ofte, ke la diablo, se li ne povas

delogi iel, provas alie. Ĉu eble ĉi soleco, ĉi okazo kaj ĉi momento ne povus vekigi mian dormantan deziron kaj igi min fali tien, kie mi ne stumblis antaŭe dum tiom da jaroj? En tiaj cirkonstancoj, pli konvenas forkuri ol atendi la batalon... Sed certe mia menso mise funkcias, se konsideri, ke mi pensas kaj parolas tiom da stultaĵoj: ĉar ne eblas, ke duenjo dika, longavuala kaj kun okulvitroj povus vekigi aŭ eksciti eĉ unu lascivan personon en la plej degenerinta koro de la mondo. Ĉu hazarde ekzistas sur la tero ia duenjo kun karesinda karno? Ĉu hazarde troviĝas en la mondo ia duenjo ne impertinenta, afekta kaj prudaĉa? Forvelu do, vi, bando da duenjoj, tute senvaloraj por la homaj plezuroj! Ho, kiel bone faris la damo, kiu laŭdire havis en sia *estrado* du manekenojn en figuro de duenjoj, kun ties okulvitroj kaj kudro-kuseneto, kvazaŭ ili farus punton! Kaj tiaj statuoj donis al sia ĉambro la saman respektindon, kiel veraj duenjoj.

Tion dirante, li eksaltis el la lito kun intenco fermi la pordon, por ke sinjorino Rodríguez ne eniru denove, sed en la momento, kiam li atingis ĝin, sinjorino Rodríguez jam alpaŝis kun luma kandelo el blanka vakso. Sed, vidante pli deproksime la hidalgon, envolvitan en la peplomo, kun la bandaĝoj kaj la dormo-ĉapo, ŝi denove ektimis, retroiris du paŝojn kaj diris:

—Ĉu mi estas sekura, sinjoro kavaliro? Ĉar tio, ke vi eliris el la lito, ne ŝajnas montri honestan intencon de via flanko.

—Mi volus fari la vi la saman demandon, sinjorino — respondis don Quijote—. Diru: ĉu mi estas sekura kontraŭ atako aŭ perforto?

—De kiu vi petas tian sekurecon, sinjoro kavaliro? — demandis la duenjo.

—De vi mem —respondis don Quijote—, ĉar mi ne konsistas el marmoro, nek vi el bronzo, kaj nun estas, ne la deka horo matene, sed la noktomezo, aŭ eble iom pli. Krome, ni troviĝas en ĉi ĉambro, pli kaŝita kaj sekreta ol sendube estis la groto, kie la perfida kaj aŭdaca Eneo ĝuis la belan kaj kompateman Didonan. Sed donu al mi la manon, sinjorino, ĉar verdire, ne ekzistas pli granda sekureco ol mia ĉasto kaj virto, kaj la respekto inspirata de viaj vualoj.

Tion dirinte, li kisis sian dekstran manon, kaj prenis per ĝi la ŝian, post ol ŝi faris la saman ceremonion.^[368]

Ĉi tie Cide Hamete paŭzas por ĵuri je Mahomedo, ke li volonte donus la pli bonan el siaj du kaftanoj, por vidi ilin paŝi de la pordo al la lito kun la manoj kunkroĉitaj.

Fine don Quijote enlitiĝis, kaj doña Rodríguez, ĉiam kun siaj okulvitroj kaj kun sia kandelo, sidiĝis sur seĝo je ioma distanco de la lito. Don Quijote buliĝis kaj kovris sin tute, montrante nur la vizaĝon, kaj post ol la du homoj trankviliĝis, la hidalgo rompis la silenton, dirante:

—Sinjorino doña Rodríguez, via moŝto povas elverŝi vian aflikton kaj senpezigi vian koron: mi aŭskultos vin per ĉastaj oreloj kaj helpos vin per aktiva kompatato.

—Tion mi kredas —diris la duenjo—, ĉar de via agrabla kaj ĝentila persono, oni povas atendi nur respondon tiel kristanan. Okazas, sinjoro don Quijote, ke, kvankam via moŝto vidas min sur ĉi seĝo, meze de la regno Aragón kaj en kostumo de duenjo konsumita kaj mistraktata de la sorto, mi naskiĝis en Asturias, kaj en familio ligita al multaj el la plej bonaj de la dirita provinco; sed mia mava sorto, kaj la senzorgo de miaj gepatroj, kiuj perdis sian havon sen scii kial aŭ kiel, kondukis min al la ĉefurbo, al Madrid, kie, por vivi trankvile kaj eviti al si pli grandaj misfortunojn, miaj

gepatroj metis min kiel ĉambristinon je la servo de nobela damo. Kaj sciu, sinjoro, ke en mia tuta vivo mi ne renkontis eĉ unu personon kapablan superi mian lerton en la brodado kaj en la kudro de tolaĵoj. Nu, miaj gepatroj lasis min en ŝia palaco, reiris al sia lando kaj, kelke da jaroj poste, certe vojaĝis al la ĉielo, ĉar ili estis ankaŭ bonaj kaj kristanaj katolikoj. Mi vivis orfa kaj dependanta de la mizera salajro kaj la ridindaj favoroj ordinare ricevataj de la ĉambristinoj ĉe tiaj nobeloj. Tiam okazis, ke certa ŝildisto de la palaco, viro jam olda, barba kaj korpulenta, kaj precipe hidalgo kiel la reĝo, ĉar li naskiĝis en Asturias, enamiĝis al mi, sen ke mi donus al li ajnan okazon por tio. Pasis la tempo, sed ni ne tenis niajn rilatojn tiel sekretaj, ke nia sinjorino ne ekscius pri ili, kaj por eviti, ke la homoj klaĉadu, ŝi igis nin geedziĝi laŭ la ritoj kaj ceremonioj de la Sankta Eklezio Katolika Romana. De nia geiĝo ni havis filinon, kio metis finon al mia bona sorto (se tian mi ĝuis), ĉar, kvankam mi ne mortis en la akuŝo, okazinta ĝustatempe kaj facile, mia edzo forpasis iom poste kaŭze de certa incidento, tia, ke se mi havus tempon por ĝin rakonti, sendube ĝi mirigus vian moŝton.

Ĉe tio ŝi komencis kortuŝe plori, kaj daŭrigis:

—Pardonu min, sinjoro don Quijote, sed mi ne povas regi min. Ĉiufoje kiam mi memoras mian povran edzon, la larmoj inundas miajn okulojn. Je Dio! Kiel solene li portis mian sinjorinon post si, sur la grupo de forta mulo, nigra kiel la gagato mem! Tiam oni ne utiligis kaleŝojn nek portoseĝojn (male ol, laŭdire, oni faras nuntempe), kaj la sinjorinoj rajdis post siaj ŝildistoj sur la sama ĉevalo. Sed la jenan epizodon mi rakontu al vi, por ke vi havu ideon pri la bona edukiteco kaj ĝentilaj manieroj de mia kara edzo: foje, kortega juĝisto, kun eskorto de du ĝendarmoj antaŭe, estis elrajdanta el la strato Santiago, en Madrid, (strato iom mallarĝa), en la ĝusta momento kiam mia edzo pretis eniri en ĝin. Sed, vidante la juĝiston, mia bona ŝildisto tuj bridis la mulon kaj

igis, ke ĝi duonturniĝu kvazaŭ li volus akompani la juĝiston. [369] Mia sinjorino, sidanta sur la grupo, diris al li flustre: «Kion vi faras, stulta? Ĉu vi forgesis, ke mi estas ĉi tie?». La juĝisto detenis sian ĉevalon, pro ĝentilo, kaj diris: «Daŭrigu vian vojon, sinjoro. Al mi apartenas akompani sinjorinon doña Casilda». (Mia mastrino nomiĝis tiel). Tamen mia edzo, kun la ĉapo en la mano, insistis en sia ideo akompani la juĝiston, kaj, vidante tion, mia sinjorino, plena de kolero kaj ĉagreno, prenis dikan pinglon (aŭ specon de aleno, mi kredas) kaj enpuŝis ĝin en lian lumbon. Mia edzo ĵetis fortan krion de doloro, kaj tiel abrupte turnis sin, ke li kaj lia mastrino falis surteren, Du lakeoj ŝiaj, same kiel la juĝisto kaj la ĝendarmoj, alkuris helpi ŝin leviĝi. La placo Guadalajara agitiĝis, t.e. la neniofaraj uloj tie pasumantaj. Mia sinjorino revenis piede al sia hejmo kaj mia edzo iris en barbarejon, [370] dirante, ke oni trapikis al li la korpon. Sekve de ĉio ĉi, li akiris tian reputacion de ĝentila homo, ke la buboj ofte persekutis lin sur la stratoj, kriante al li mokajn nomojn. Pro la incidento, kaj pro tio, ke li estis iom kurta-vida, mia sinjorino maldungis lin, kaj ĉi afero tiel multe lin deprimis, ke mi pensas, ke sendube la aflikto kaŭzis la li morton. Mi restis do vidvino, forlasita kaj ŝarĝita per unu filino, kies belo kreskis kiel la ŝaŭmo de la maro. Fine, dank' al mia reputacio de lerta kudristino, mia nuna sinjorino la dukino, tiam ĵus edziniĝinta kun mia mastro la duko, volis preni min kun si, kaj cetere ankaŭ mian filinon, al ĉi regno Aragón, kie, tagon post tago, plu kreskis mia filino kaj, kun ŝi, la tuta ĉarmo de la mondo: ĉar ŝi kantas kiel kalandro, dancas kiel la pensoj, saltas kiel kapreolo, legas kaj skribas kiel lerneja instruisto kaj kalkulas kiel avarulo. Pri ŝia amo al la pureco mi diras nenion ĉar eĉ ne la flua akvo pli puras ol ŝi. Nun ŝi havas, se mi bone memoras, dek ses jarojn, kvin monatojn kaj tri tagojn, pli malpli. Nu okazis, ke la filo de tre riĉa kampulo vivanta ne for de ĉi tie, en unu el la vilaĝoj de mia sinjoro la duko, enamiĝis al mia filino kaj, mi ne scias kiel, la paro

kuniĝis. Sub promeso de edziĝo li trompis ŝin kaj nun li rifuzas plenumi sian parolon. Kaj, kvankam mia sinjoro la duko scias pri la tuta afero, ĉar mi mem plendis ĉe li ne unu fojon, sed multajn, kaj petis lin devigi la kampulon edziĝi al mia filino, tamen miaj vortoj eniras al li tra unu orelo kaj eliras tra la dua, kaj li apenaŭ volas aŭskulti min. La kaŭzo de tio estas, ke la patro de la deloginto tre riĉas, pruntas monon al la duko, kaj ofte metas kaŭcion kiel garantion de liaj ŝuldoj, sekve la duko neniel volas ĉagreni aŭ kontraŭi lin. Mi dezirus do, sinjoro don Quijote, ke via moŝto entreprenu la riparon de ĉi arbitro, ĉu per petoj, ĉu per armoj, ĉar, laŭ ĝenerala onidiro, vi venis en la mondon por tiaj riparoj, kaj ankaŭ por korekti misfarojn kaj protekti la senfortunajn. Via moŝto pensu precipe pri la orfaneco de mia filino, pri sia ĝentilo, pri ŝia juna aĝo, kaj pri ŝiaj ceteraj bonaj kvalitoj jam antaŭe menciitaj; kaj mi ĵuras je Dio kaj mia konscienco, sinjoro, ke inter la ĉambristinoj de mia dukino, eĉ ne unu valoras pli ol la tondaĵoj de ŝiaj ungoj. Kaj rilate al la nomata Altisidora, laŭdire la plej ĉarma kaj sprita, ŝi staras almenaŭ ses mejlojn post mia filino. Ne forgesu, sinjoro, ke ne ĉio estas oro, kio brilas: ĉi Altisidoraĉa havas pli da vanto ol la belo, kaj pli da senhonto ol da modesto. Krome, ŝi ne tre sanas, ĉar ŝia elspiro odoraĉas, tiel, ke oni ne povas resti momenton apud ŝi. Kaj eĉ mia sinjorino la dukino... sed mi silentu: oni diras, ke la muroj havas orelojn.

—Je mia vivo, sinjorino doña Rodríguez! Kio okazas al la sinjorino dukino? —demandis don Quijote.

—Se vi tiel ĵurpetas, mi ne povas ne respondi per la vero vian demandon —diris la duenjo—. Ĉu vi rimarkis, sinjoro don Quijote, la belon de mia sinjorino la dukino, ŝian haŭton glatan kaj brilan kiel la klingo de glavo, ŝiajn vangojn el lakto kaj karmino, kun la suno en unu kaj la luno en la dua, kaj ŝian gracian irmanieron, kvazaŭ, paŝante, ŝi disdegnus la teron? Ĉu ne ŝajnas, ke ŝi radias sanon, kien ajn ŝi iras? Nu,

sciuj via moŝto, ke ŝi devas danki pro tio, unue al la ĉielo, kaj due al siaj du fontoj, unu en ĉiu kruro,^[371] ĉar ili elfluas la mavaj humoroj, kiuj plenigas ŝin laŭ la aserto de kuracistoj.

—Sankta Maria! —ekkriis don Quijote—. Ĉu eble mia sinjorino la dukino havas tiajn defluejojn? Mi ne kredus ion tian, eĉ se senŝuaj monaĥoj tion ĵurus al mi. Sed se vi, sinjorino Rodríguez, tiel firme asertas la aferon, sendube vi pravas. Tamen, tiaj fontoj, kaj en tiaj lokoj, certe distilas, ne humorojn, sed likvan ambron. Mi vere kredas nun, ke fari al si tiajn fontojn tre konvenas al la sano.

Apenaŭ don Quijote finis paroli, kiam oni abrupte apertis kun granda bruo la pordon de la ĉambro, kaj doña Rodríguez ricevis tian ŝokon, ke la kandelo falis el ŝia mano, lasante la ĉambron tiel obskura kiel buŝo de lupoj, kiel oni ordinare diras. Tuj poste la povra duenjo sentis, ke du manoj premas ŝian kolon, kun tiom da forto, ke ŝi apenaŭ povis spiri, dum alia persono, rapide kaj senparole, suprentiris ŝian jupon kaj komencis doni al la kompatinda doña Rodríguez, ŝajne per unu pantoflo, grandan nombron da batoj. Kaj, kvankam don Quijote ja kompatis ŝin, li ne moviĝis de la lito, kaj sen kompreni, kio vere okazas, kuŝis senmova kaj silenta, kaj eĉ timis, ke la pluvo da batoj povus fali ankaŭ sur lin... Li prave timis, ĉar la mutaj ekzekutistoj, lasinte draŝita la duenjon (kiu eĉ ne kuraĝis vei), turnis sin kontraŭ la hidalgon, elŝiris lin el sub la litotuko kaj la peplomo, kaj pinĉadis lin tiel forte kaj ofte, ke li devis defendi sin per la pugnoj: kaj ĉio ĉi okazis en la plej stranga silento.

La batalo daŭris preskaŭ duonon de horo, la fantomoj forglitis, doña Rodríguez aranĝis al si la jupon, kaj ĝemante je sia misfortuno, elpasis tra la pordo, sen diri eĉ unu vorton al don Quijote. La hidalgo, dolorplena, pinĉita, perpleksa kaj pensema, restis sola. Kaj tie ni lasas lin kun lia deziro scii, kiu perversa sorĉisto metis lin en tian staton. Sed ĉion oni

rakontos siatempe; nun, Sancho Panza nin vokas, kaj la ordo postulata de ĉi historio trudas, ke ni reiru al li.

[368] Kisi al si la propran manon, antaŭ ol premi la manon de alia persono, estis elmonro de rekta kaj honesta intenco.

[369] Kelkfoje oni akompanis pro ĝentilo, sur parto de la vojo, personon pli altrangan hazarde renkontitan.

[370] La barbiroj havis kelkan scion pri medicino kaj funkciis kiel ĥirurgoj.

[371] «fontoj» nomiĝis certaj ulceroj, el kiuj fluis puso kaj aliaj likvaĵoj; kelkokaze oni ilin faris intence por, laŭ la tiamaj ideoj, elpurigi tiel la korpon el ĝiaj nocaj substancoj.

Ĉapitro 49

Pri tio okazinta al Sancho Panza en lia rundo de la insulo

Ni lasis la grandan gubernatoron kolera kaj ĉagrenita kontraŭ la fripona kampulo portreto-pentra, kiu, instrukciita de la majordomo (kaj ĉi lasta instrukciita de la duko), kunlaboris kun ili por mokadi Sanchon. Sed la ŝildisto, kvankam senscia, krud-maniera kaj grasa, tamen sciis teni sin sur sia tereno, kaj diris al la ĉeestantoj, kaj ankaŭ al la doktoro Pedro Recio (reveninta en la ĉambron, post ol oni traktis private la leteron de la duko):

—Mi komprenas nun tre bone, ke la gubernatoroj kaj juĝistoj devas, aŭ devus, esti el bronzo por elporti la trudiĝemon de ĉi negocistoj, kiuj volas ĉiusezone kaj ĉiuhore, ke oni aŭskultu kaj traktu iliajn aferojn senkonsidere al ĉio cetera. Kaj se la kompatinda juĝisto nek aŭskultas nek traktas ilin, ĉar li ne povas, aŭ ĉar ne sonis la horo de la aŭdienco, tiam la negocistoj tuj komencas malbeni, kritiki kaj kalumnii lin kaj eĉ ĵetas koton sur la reputacion de lia familio. Stulta kaj idiota negocisto: ne rapidu; atendu la ĝustan momenton kaj la konvenan okazon por aferumi; ne venu ĉe la manĝo- aŭ dormo-horo, ĉar la juĝistoj estas el karno kaj ostoj kaj devas doni al siaj korpoj kion la Naturo postulas. Sed oni esceptu min, se konsideri, ke mi ne nutras mian propran korpon, dank' al la sinjoro doktoro Pedro Recio Tirteafuera, ĉi tie ĉeestanta, kiu deziras, ke mi mortu de malsato, kaj asertas, ke tia morto estas la vivo. Dio donu ĉi vivon al li kaj al la ceteraj de lia speco, t.e. al la fuŝaj kuracistoj, ĉar la bonaj meritas palmobranĉojn kaj laŭrojn.

Kiuj konis Sanchon, miris aŭdante lin paroli tiel elegante, kaj ne sciis al kio atribui tian fenomenon, kvankam ili supozis, ke la gravaj oficoj kaj postenoj, aŭ stimulas, aŭ sufokas la inteligenton. Fine, doktoro Pedro Recio Agüero de Tirteafuera promesis al Sancho lasi lin manĝi en la nokto, eĉ se agante tiel, oni pekus kontraŭ la kompleta serio de aforismoj de Hipokrato. La gubernatoro, kontenta kun lia promeso, atendis ege senpacience la nokton, kaj, kvankam ŝajnis al li, ke la tempo absolute haltis, tamen alvenis la momento tiel longe dezirata, kaj oni surtabligis al li stufitan bovinaĵon kun cepoj kaj kelke da rostitaj piedoj de bovido iomete tro aĝa. Sancho ĵetis sin sur la pladojn kun pli da apetito ol se oni estus prezentinta al li frankolinojn el Milano, fazanojn el Romo, bovidaĵon el Sorrento, perdrikojn el Morón aŭ anserojn el Lavajos.^[372] Kaj, manĝante, li diris al Pedro Recio:

—Aŭskultu, sinjoro doktoro: de nun, ne gravas se vi ne donos al mi rafinitajn padojn aŭ delikataĵojn, ĉar tiaj viktualioj elskuas mian stomakon el ties ĉarniroj. Ĝi kutimiĝis al viando kapra kaj bova, al lardo, fumaĵoj, napoj kaj cepoj, kaj se hazarde oni donus al ĝi palacajn pladojn, ĝi ricevus ilin rifuzeme kaj kelkfoje eĉ kun naŭzo. Estus bone se la butleroj alportus al mi la tiel nomatan olapodridon^[373] (ju pli ĝi putras, des pli ĝi bongustas). Li povas enmeti en la olapodridon ĉion ajn, laŭ sia bontrovo, kondiĉe ke ĉio estu manĝebla; mi dankus lin kaj iam repagus al li la favoron. Kaj nun, neniuj moku min, ĉar, aŭ ni ĉiuj estas seriozaj, aŭ ni ĉiuj ŝercas. Ni vivu kaj manĝu do en paco kaj konkordo, ĉar, kiam Dio sendas la lumon de la aŭroro, la tago brilas por ni ĉiuj. Mi regos ĉi insulon sen damaĝi la intereson de aliaj kaj sen forgesi mian propran intereson. Kaj oni havu la okulojn apertaj kaj bone atentu, ĉar la diablo troviĝas en Cantillana,^[374] kaj, se oni donos al mi la okazon, oni vidos min fari mirindaĵojn. Vere, la muŝoj manĝas personon tro dolĉan.

—Via moŝto tre pravas, sinjoro gubernatoro —diris la butlero —, kaj, je la nomo de la insulanoj, mi informas vin, ke ili servos vian moŝton senhezite, ame kaj bonvole, ĉar, jam de la komenco de via ofico, via milda maniero regi lasas al ili nenian pretekston fari aŭ pensi ion al vi kontraŭan.

—Mi vin kredas —respondis Sancho—, kaj ili estus idiotoj, se ili pensus aŭ agus alie. Kaj mi ripetas, ke oni zorgu nutri min kaj mian azenon, ĉar tio plej gravas kaj atentindas. Kaj, kiam la horo alvenos, ni faros rondon, tial, ke mi intencas elpurigi ĉi insulon je nedecaĵoj, vagabondoj kaj uloj pigraj kaj friponaj. Sciu, amikoj, ke la homoj sentaŭgaj kaj neniofaraj similas, en la regno, al la virabeloj, kiuj manĝas la mielon produktitan de la abelinoj. Mi intencas doni protekton al la kamparanoj, garantii al la hidalgos ties privilegiojn, asigni premion al la virtuloj kaj, ĉefe, respekti la religion kaj honori la ekleziulojn. Kion vi opinias pri miaj projektoj, amikoj? Ĉu mi diris ion saĝan aŭ ne?

—Tiel saĝan, sinjoro gubernatoro —respondis la majordomo —, ke mi miras, ke homo apenaŭ klera, povas diri tiom da aferoj plenaj de trafaj juĝoj kaj konsiloj, tiel diferencaj de tio, kion atendis de via kapablo la personoj sendintaj vin ĉi tien. Sed ĉiutage oni vidas en la mondo neatenditajn aferojn: la ŝercoj turniĝas en seriozaĵojn, kaj la mokantoj vidas sin mokataj.

Alvenis la nokto, kaj la gubernatoro, manĝinte kun la permeso de la sinjoro doktoro Recio, pretigis sin por la rundo kaj eliris kun la majordomo, la sekretario, la butlero, la kronikisto —kies devo konsistis en la notado de la faroj de Sancho— kaj kun tiom da oficistoj kaj ĝendarmoj, ke la tuto formis ne etan batalionon. Sancho marŝis tiel bele en la mezo de la grupo, kun sia justico-vergo, ke neniam alia spektaklo pli vidindus. Suririnte kelke da stratoj, ili aŭdis bruon de kunfrapiĝo de klingoj, alkuris kaj trovis, ke nur du

viroj interbatalas. Sed la paro, vidante veni la reprezentantojn de la justico, ĉesis ataki sin reciproke, kaj unu el ili kriis:

—Helpon, je la nomo de Dio kaj de la reĝo! Ĉu oni toleru, ke sur la stratoj de ĉi vilaĝo, la homoj estu atakataj kaj prirabataj?

—Trankviliĝu, bonulo —diris Sancho—, kaj rakontu al mi la motivon de ĉi kverelo: mi estas la gubernatoro.

Ĉe tio, lia antagonisto diris:

—Sinjoro gubernatoro, mi rakontos al vi ĉion per nur kelke da vortoj. Dio scias kiamaniere, ĉi viro ĵus gajnis en la monludejo, tie proksime, pli ol mil realojn. Mi ĉeestis la ludon kaj, kontraŭ la diktado de mia konscienco, mi donis opinion al li favoran rilate al ne tre klaraj kartometoj liaj. Li forlasis kun sia gajnita mono la tablon, kaj, kiam mi esperis, ke li donus al mi almenaŭ unu eskudon kiel rekompenco (ĉar tiom oni kutimas doni al gravuloj kiel mi, kiuj ĉeestas la partiojn de kartoj por juĝi pri la iro de la ludo, por apogi la trompistojn kaj por evitigi kverelojn), nu, li enbursigis sian monon kaj eliris el la domo. Ĉagrenita, mi sekvis lin kaj per ĝentilaj kaj mildaj vortoj mi petis lin, ke li donu al mi almenaŭ ok realojn, ĉar li scias, ke mi estas honesta homo sen metio kaj have, tial, ke miaj gepatroj instruis al mi nenian profesion kaj postlasis al mi eĉ ne unu soldon. Sed li, pli ŝtelema ol Kako kaj pli granda trompisto ol Andradilla, [\[375\]](#) volis doni al mi nur kvar realojn. Via moŝto vidu do, sinjoro gubernatoro, kiel senhonta kaj senkonsciencia li estas. Sed mi ĵuras, ke se via moŝto ne aperintus, mi igus lin vomu sian gajnitan monon kaj instruus lin, kiel oni dece konduku.

—Kion vi diras al tio? —demandis Sancho, turnante sin al la alia viro.

La viro respondis, ke lia kontraŭulo parolis la veron, kaj ke li volis doni nur kvar realojn, ĉar li jam ofte donacas al li la menciitan sumon. Li aldonis, ke la atendantoj de monaj rekompencoj devas montri sin afablaj kaj ĝentilaj kaj preni kun rideto kiom ajn oni proponas al ili, kaj ne diskuti kun gajninto, se ili ne certas, ke li estas trompisto kaj gajnas per fiaj procedoj. Li asertis, ke la fakto, ke li ne volis rekompenci la entrudulon, plej bele pruvis, ke li estas honesta homo, ne ŝtelisto, ĉar la trompistoj ĉiam devas pagi tributon al siaj komplikoj.

—Li pravas —diris la majordomo—. Nun, sinjoro gubernatoro, decidu kion oni faru al ĉi homoj.

—Nu, jen mia verdikto —respondis Sancho—. Vi, kiu gajnis per honesta, artifika aŭ indiferenta rimedo, donu ĉi tie kaj nun cent realojn al via agresinto, kaj krome, tridek por la paŭperaj sidantaj en la karcero. Kaj vi, senmetia, senmona, neniofara vagulo, tuj prenu la cent realojn kaj jam morgaŭ foriru de la insulo por dekjara ekzilo; kaj se vi ne obeos mian ordonon, vi plenumos vian punon en la transa mondo, ĉar mi, aŭ la ekzekutisto, laŭ mia ordono, pendumos vin. Kaj neniu el vi kontestu min, se vi ne volas senti la pezon de mia mano.

Unu el la viroj elpoŝigis la monon, kaj la alia prenis ĝin. La unua sin direktis al sia hejmo, la dua ekiris la vojon por forlasi la insulon, kaj la gubernatoro daŭrigis:

—Nu, aŭ mi havas etan povon, aŭ mi eliminis la monludejojn, ĉar mi suspektas, ke ili tre damaĝas.

—Almenaŭ ĉi ludodomon vi ne povos elimini —rimarkis unu el la oficistoj—. Ĝi apartenas al eminentulo, kiu perdas per la

kartoj ege pli ol li gajnas. Sed vi povos efike uzi vian povon kontraŭ ludejaĉoj de minora gravo, la plej nocaj kaj friponecaj. En la domoj de ĉefaj kavaliroj kaj altranguloj, la trompisto konataj ne kuraĝas utiligi siajn ruzojn, kaj tial, ke la pasio monludi ĝeneraliĝis, preferindas, ke oni ludu ĉe kavaliroj, ne ĉe friponaj uloj, kie, post la noktomezo, oni senhaŭtigas la kompatindan tie manipulitan.

—Efektive, sinjoro oficisto, mi vidas nun, ke oni povus multe rakonti ĉi-rilate.

Tiam alvenis ĝendarmo, kiu firme retenis junulon per la mano, kaj diris:

—Sinjoro gubernatoro, ĉi knabo estis iranta al ni sur ĉi vojo, sed tuj kiam li ekvidis la reprezentantojn de la justico, li turnis la dorson kaj komencis kuri kiel damao, kio montras, ke certe li estas deliktulo. Mi persekutis lin, kaj tial, ke li stumblis kaj falis, mi povis lin kapti. Alie, mi neniam atingus lin.

—Kial vi forkuris? —demandis Sancho al la junulo.

—Por eviti al mi respondi la multajn demandojn de la ĝendarmoj.

—Kian profesion vi havas?

—Teksistan.

—Kion vi teksas?

—Ferajn lancopintojn, sinjoro, se tiel diri.

—Nu, vi ŝatas ŝerci, mi vidas... Tia mokemulo! Bone. Kien vi iris kun?

—Spiri liberan aeron, sinjoro.

—Kaj kie oni spiras en ĉi insulo liberan aeron?

—Kie ĝi blovas.

—Tre bone. Vi lerte respondas kaj spritumas, knabo. Sed imagu, ke mi estas la aero, ke mi alblovas vin sur vian poŭpon kaj puŝas vin en la karceron. Hej! Oni prenu lin tien, por ke ĉi-nokte li dormu sen aero.

—Je Dio —respondis la knabo—, tiel neeble estus al via moŝto igi min dormi ĉi-nokte en la karceron, kiel fari min reĝo.

—Kial mi ne igus vin dormi en la karceron? —demandis Sancho—. Ĉu mi ne havas la povon aresti kaj liberigi laŭvole?

—Eĉ se via povo estus plej granda, ĝi ne sufiĉus por igi min dormi en la karceron.

—Ĉu vere ne? —respondis Sancho—. Nu, oni tuj prenu lin tien. Li vidos per si mem, ke li trompiĝas. Kaj se la karcerestro volus propraprofite liberigi lin kontraŭ pago, mi anticipe avertas, ke mi kondamnos lin pagi du mil eskudojn, se li permesos, ke la knabo faru eĉ unu solan paŝon ekster la karceron.

—Kia ridindaĵo! —diris la junulo—. La esenco de la afero estas, ke nenia vivanta persono igos min dormi en la karceron.

—Diru, diablo —respondis Sancho—. Ĉu eble vi havas anĝelon kapablan liberigi vin de la katenoj, kiujn vi surportos, laŭ miaj ordonoj?

—Nu, bone, sinjoro gubernatoro —sprite respondis la knabo —. Ni rezonu kaj vidu la aferon deproksime. Ni supozu, ke vi sendis min en karceran ĉelon, ke tie oni ligis min per katenoj, ke oni ordonis al la ĉefo de la prizono, sub minaco je grava puno se li ne obeos, ke li ne permesu min eliri, kaj ke li plenumis la ordonon. Malgraŭ ĉio, se mi dezirus, ne dormi, sed teni min vekita la tutan nokton, kun la okuloj apertaj, ĉu via moŝto kapablus, eĉ per via tuta povo, igi min dormi?

—Certe ne —diris la sekretario—. Ĉi viro pravas.

—Ĉu vi do tenus vin vekita memvole, ne por kontraŭi min?
—demandis Sancho.

—Efektive, eĉ ne en sonĝo mi oponus al via volo —respondis la junulo.

—Se tiel, iru dormi ĉe vi, kaj Dio donu al vi profundan dormon. Mi ne volas teni vin vekita. Sed mi avertas vin, ke de nun vi ne plu moku la justicon, ĉar iam vi povus renkonti iun, kiu reĵetus viajn ŝercojn kontraŭ vian propran kapon.

La junulo foriris, kaj la gubernatoro daŭrigis sian rondon; kaj iom poste alvenis du ĝendarmoj prenantaj kun si unu homon kaj diris:

—Sinjoro gubernatoro, ĉi homo, ŝajne viro, efektive estas virino, kaj ne turpa, en vira vesto.

Oni levis al ŝiaj okuloj du tri lanternojn, ĉe kies lumo montriĝis la vizaĝo de knabino proksimume dek sesjara, bela kiel mil perloj kaj kun la haroj kuntenitaj en eta reto el ora kaj verda silko. Oni rigardis ŝin de la kapo ĝis la piedoj kaj rimarkis, ke ŝi portas ŝtrumpojn el ruĝa silko kun ĵarteloj el blanka tafto franĝe garnitaj per oro kaj perloj. Ŝia kuloto estis el verda brokaĵo, kiel ŝia loza kazako, kaj sub ĉi lasta vidiĝis saĵo el tre delikata blank-ora ŝtofo. Ŝiaj ŝuoj, viraj,

havis blankan koloron, kaj ŝi portis ĉe la zono, ne glavon, sed gemo-garnitan dagon, kaj sur la fingroj multe da riĉaj ringoj. Unuvorte, ĉiuj trovis la junulinon bela sed tute ne konis ŝin, eĉ ne la propraj insulanoj; kaj plej surpriziĝis la personoj sciantaj pri la ŝercoj farotaj al Sancho, ĉar ĉi incidenton oni ne antaŭvidis, do ili perpleksis kaj atendis, kiamaniere finiĝos la afero. Sancho miris je la belo de la knabino, kaj demandis al ŝi ŝian nomon, kien ŝi iras, kaj kio movis ŝin porti tian veston. Regata de pudora hontego, kun la okuloj fiksitaj al la tero, ŝi respondis:

—Sinjoroj, mi ne povas riveli publike kion mi tre deziris teni sekreta. Sed mi volas, ke oni bone komprenu unu aferon: mi estas nek ŝtelistino nek perversa persono, sed senfortuna pucelo puŝita de la ĵaluzo forgesi mian decosenton.

Tion aŭdinte, la majordomo diris al Sancho:

—Sinjoro gubernatoro, ordonu, ke ĉiuj personoj apartiĝu, por ke la sinjorino parolu kun malpli da embaraso kion ŝi volos.

La gubernatoro tion ordonis. Ĉiuj apartiĝis, krom la majordomo, la butleroj kaj la sekretario, kaj la pucelo diris tiam:

—Sinjoroj, mi estas filino de Pedro Pérez Mazorca, kolektisto de la lanimpoto en ĉi vilaĝo kaj ofta vizitanto de mia patro.

—Tio ne kredeblas, sinjorino —respondis la majordomo—. Mi tre bone konas Pedron Pérez kaj scias, ke li havas nek filon nek filinon. Krome, vi diris, ke li estas via patro, kaj poste vi aldonis, ke li ofte vizitas vian patron!

—Ankaŭ mi rimarkis tian absurdon —diris Sancho.

—Vere, sinjoroj, en mia konfuziteco mi eĉ ne scias kion mi diras —respondis la pucelo—. Efektive, mi estas filino de

Diego de la Llana. Viaj moŝtoj certe konas lin.

—Nu, tio pli kredindas —diris la majordomo—. Mi konas Diegon de la Llana, kaj scias, ke li estas grava kaj riĉa hidalgo, kun unu filo kaj unu filino. De kiam li vidviĝis, neniu en ĉi loko povas aserti, ke li vidis la vizaĝon de lia filino, ĉar li tenas ŝin tiel kaŝita, ke eĉ ne la suno havas la ŝancon ŝin vidi. Tamen, ŝi tre belas, laŭ la famo.

—Efektive, mi estas lia filino —respondis la pucelo. Kaj rilate al la famo pri mia belo, certe vi jam elreviĝis, ĉar vi povis vidi min.

Tiam ŝi komencis kortuŝe plori, kaj la sekretario, tion vidante, flustris ĉe la orelo de la butleroj:

—Sendube io grava okazis al ĉi kompatinda pucelo, se konsideri ke, malgraŭ sia rango, ŝi iras en tia vesto kaj ĉi-hore sur la stratoj, anstataŭ sidi hejme.

—Vi pravas —respondis la butleroj—. Krome ŝiaj larmoj konfirmas vian opinion.

Sancho konsolis ŝin laŭpove kaj petis ŝin rakonti, sen ia timo, ĉion okazintan al ŝi. Kaj li aldonis, ke ĉiuj serioze klopodus ĉiel helpi ŝin.

—Sciu, sinjoroj —ŝi respondis—, ke mia patro tenis min enfermita dek jarojn, t.e. de kiam mia patrino komencis kuŝi en la tombo. Ĉe mi oni celebras la meson en riĉa kapelo, interne de la hejmo, kaj en la menciita tempo mi vidas nur la sunon en la tago kaj la lunon kaj stelojn en la nokto, kaj ne sciis kio estas stratoj, placoj, kirkoj, aŭ eĉ viroj, se escepti mian patron, mian fraton kaj la kolektiston de la lanimposto, Pedro Pérez, kiu nin vizitas tiel ofte, ke mi havis la ideon diri, ke li estas mia patro. Tia enfermiteco kaj la fakto, ke oni eĉ ne permesis al mi viziti la kirkon, tre ĉagrenis min jam de

multaj tagoj kaj monatoj. Mi deziris vidi la mondon aŭ, almenaŭ, la vilaĝon kie mi naskiĝis. Kaj mi pensis, ke per tia deziro mi ne pekas kontraŭ la pudoro propra al la puceloj de moŝta nasko. En la okazoj, kiam mi aŭdis ion rilate al taŭrludoj, turniroj aŭ teatraĵoj, mi petis de mia frato, pli juna ol mi per unu jaro, ke li parolu al mi pri tiaj aferoj kaj pri multaj aliaj nekonataj al mi. Li klarigis ilin al mi kiom li sciis, sed liaj vortoj nur ekscitis mian deziron vidi la mondon per mi mem. Fine, por ne longigi la rakonton de mia misfortuno, sciu, ke mi petis kaj suplikis mian fraton... ho, kial venis tia ideo en mian kapon?

Kaj denove ŝi komencis plori.

—Daŭrigu, sinjorino, kaj finu vian rakonton —diris la majordomo—. Viaj vortoj kaj larmoj tenas nin en streĉa atendo.

—Apenaŭ iom restas por diri —ŝi respondis—. Sed multe da larmoj mi verŝos ankoraŭ, ĉar nedecaj deziroj povas alporti nur misfortunojn...

La beleco de la junulino faris profundan impreson en la koro de la butlero. Li denove proksimigis al ŝi la lanternon por revidi ŝin, pensis, ke el ŝiaj okuloj fluas, ne larmoj, sed roso, kaj eĉ orientaj perloj, kaj esperis, ke ŝia misfortuno ne estis tiel granda, kiel ŝiaj larmoj kaj veoj ŝajnis indiki. La gubernatoro senpacienciĝis pro la paŭzemo de la knabino en la rakontado de ŝia historio, kaj diris al ŝi, ke ŝi metu finon al ilia suspenso, ke jam estas tarde, kaj ke ili devas fari ankoraŭ grandan parton de la rundo. Tiam, inter plorsingultoj kaj sufokaj ĝemoj, ŝi respondis:

—Mia misfortuno kaj mia malfeliĉo estas, ke mi petis mian fraton prunti al mi unu el siaj vestoj kaj preni min kun si por vidi nokte la vilaĝon dum la dormado de mia patro. Tedate

de miaj suplikoj, li fine konsentis, pruntis al mi ĉi veston kaj surmetis alian mian, kiu sidas sur li kvazaŭ fasonita laŭmezure, ĉar li havas la vizaĝon tute senhara kaj ŝajnas belega pucelo. Nu, ĉi-nokte, antaŭ proksimume unu horo, ni eliris kaŝe el la domo, kaj nia juna kaj senorda fantazio kondukis nin rondiri la vilaĝon. Kaj kiam ni volis reveni hejmen, ni vidis proksimiĝi grandan grupon de viroj, kaj mia frato diris al mi: «Fratino, tio sendube estas la rundo: metu flugilojn al viaj piedoj kaj kuru post mi, por ke oni ne konu nin: alie, ni trovos nin en embarasa situacio». Tion dirante, li turnis la dorson kaj komencis, ne kuri, sed flugi. Sed apenaŭ mi faris ses paŝojn mi falis pro la timo, kaj tiam alvenis la ĝendarmo, kiu prenis min antaŭ viaj moŝtoj. Kaj pro mia kapricemo kaj mava inklino mi vidas min ĉi tie, plena de honto antaŭ tiom da viroj.

—Sinjorino, ĉu efektive okazis al vi nenio malagraba? — demandis Sancho—. Ĉu ne pro ĵaluzo vi forlasis la hejmon, kiel vi antaŭe diris?

—Nenio okazis al mi, nek ekzistis tia ĵaluzo. Mi deziris nur vidi la mondon, kiu por mi limiĝis al la stratoj de la vilaĝo.

La veron de ŝia rakonto plene konfirmis la alveno de du ĝendarmoj kondukantaj ŝian fraton, kiun unu el ili kaptis, kiam la junulo kuris de sia fratino. Li portis nur riĉan jupon kaj manteleton el blua damasko kun delikataj orfadenaj pasamentoj. Lian kapon kovris nenia ĉapelo, kaj ĝin garnis nur liaj propraj haroj, similaj al ringoj oraj pro ilia krispa blondo. La gubernatoro, la majordomo kaj la butlero apartiĝis kun li kaj, ekster la aŭdo de lia fratino, demandis lin, kial li portas tian veston. La junulo, same honte kaj embarasite kiel lia fratino, rakontis la saman historion, kiun ŝi antaŭe eldiris, ĉe la granda kor-faciliĝo de la am-tuŝita butlero. Tiam Sancho turnis sin al la geknaboj kaj diris:

—Vi faris veran infanaĵon, kaj ne necesis tiom da larmoj kaj longaj suspiroj por la rakontado de via stulta aventuro. Se vi dirintus: «Ni estas Tiu kaj Tiu kaj eskapis el la domo de nia patro pro nura scivolo, sen aliaj intencoj», nu, la rakonto finiĝus sen ĝemoj, ploroj kaj tiel plu.

—Vi pravas —respondis la pucelo—, sed viaj moŝtoj sciu, ke pro mia granda embaraso, mi ne povis teni min inter la ĝustaj limoj.

—Nenio bedaŭrinda okazis —diris Sancho—. Mi kondukos vin ambaŭ al via hejmo. Eble via patro ne rimarkis vian foreston. Kaj de nun ne konduku tiel infanece, nek tiele sopiru vidi la mondon: ĉar virta virino straton ne konas; virino kaj kokino promenante trovas sian ruinon; kaj ino inklina ĉion vidi, deziras ankaŭ esti vidata... Kaj punkto.

La knabo dankis al la gubernatoro la favoron eskorti ilin al ilia hejmo, ne tre dista de tie. Alveninte antaŭ la domo, la frato ĵetis ŝtoneton al fenestro, kaj tuj poste unu servistino ilin atendanta descendis, apertis la pordon, la gefratoj eniris, dum iliaj akompanintoj staris senmovaj kaj miris ne nur je ilia belo kaj ĝentilo, sed ankaŭ je ilia deziro vidi la mondon en la nokto kaj sen eliri el la vilaĝo; sed oni tion atribuis al ilia frua juneco.

La butlero, vundita de la sago de Amoro, decidis en si ke, en la sekvanta tago, li petus de la patro de la junulino ŝian manon, kaj havis la certecon, ke oni ne rifuzus lin, tial, ke li estas servisto de la duko. Kaj eĉ Sancho karesis en si la ideon edzigi la knabon al sia filino Sanchica. En sia konvinkiĝo, ke nenia viro povus rifuzi edziĝi al filino de gubernatoro, li decidis aranĝi siatempe la aferon.

Per tio finiĝis la nokta rundo. Sed du tagojn poste finiĝis ankaŭ la gubernatoreco, kio, kiel oni baldaŭ vidos, renversis

kaj vanigis la projekton de Sancho.

[372] Morón kaj Lavajos estas du hispanaj vilaĝoj, iam famaj pro la bona kvalito de siaj respektivaj perdrikoj kaj anseroj.

[373] Neologismo. Hispane «olla podrida», laŭlitere «putranta poto». Tiel nomiĝas la poto en kiu oni kuiras samtempe multe da diversaj kaj bongustaj nutraĵoj. Ankaŭ tradukita en la ĉapitro 47 de la dua parto per la esprimo «miksita stufaĵo».

[374] Iama proverba esprimo; signifas, ke ekzistas la danĝero de baldaŭa konflikto. Sancho aludas la anoncitan atakon kontraŭ la insulon, kaj tuj poste paradas sian kuraĝon.

[375] Andradilla estis fama monluda fripono en la epoko de Cervantes.

Ĉapitro 50

Kie riveliĝas la identeco de la sorĉistoj kaj ekzekutistoj, kiuj batis la duenjon, kaj pinĉis kaj gratis la hidalgon; kaj kie aperas la rakonto pri la paĝio portinta la leteron al Teresa Sancha, edzino de Sancho Panza

Diras Cide Hamete, ege skrupula esploranto de ĉia detalo de ĉi vera historio, ke, en la sama tempo kiam doña Rodríguez elglitis el sia ĉambro por direkti sin al la ĉambro de don Quijote, alia duenjo, kiu dormis kun ŝi, rimarkis ŝian eliron, kaj tial, ke ĉiuj duenjoj ŝatas scii, aŭskulti kaj flari, ŝi sekvis ŝin tiel silente, ke la bona doña Rodríguez nenion suspektis. Sed la alia, vidante ŝin enpaŝi en la ĉambro de don Quijote, kaj tenante sin fidela al la ĝenerala kutimo de la duenjoj, t.e. al la klaĉado, tuj iris komuniki al sia sinjorino la dukino, ke doña Rodríguez troviĝas en la ĉambro de la kavaliro.

La dukino informis al la duko kaj petis lin, ke li permesu ŝin kaj Altisidoran iri observi kion doña Rodríguez volas ĉe la hidalgo. La duko donis sian konsenton, kaj la du virinoj, kun granda singardo kaj silento, paŝon post paŝo sin ŝovis ĝis apud la pordo de la ĉambro, tiom, ke ili povis aŭskulti ĉion, kion oni diris interne. Kaj kiam la dukino aŭdis, ke doña Rodríguez rivelas la sekreton de ŝiaj fontoj, ŝi ne povis suferi tiajn konfidencoj, kaj des malpli Altisidora. Tiel do, plenaj de kolero kaj venĝemo, ili enrompis subite en la ĉambro, kaj pinĉis la hidalgon kaj batis la duenjon, kiel menciite: ĉar la ofendoj rekte tuŝantaj la belon kaj la vanton de la virinoj ĉiam vekas en ili ekstreman furiozon kaj la deziron venĝi sin. Poste la dukino informis al sia edzo pri ĉio okazinta, kaj la duko tre amuziĝis, aŭdante ŝian rakonton.

Tiam la dukino, en sia intenco plu distriĝi mistifikante la hidalgon, sendis la paĝion (la saman, kiu antaŭe ludis la rolon de Dulcinea en la komedio kie oni anoncis ke ŝia elsorĉo efektiviĝus nur per la rimedo, kiun Sancho tute forgesis pro sia okupateco kiel gubernatoro) al Teresa Panza kun la letero de ties edzo, kun alia letero skribita per ŝia propra mano, kaj kun granda koral-koliero kiel donaco.

Nu, rakontas la historio, ke la paĝio, inteligenta kaj sprita, deziris fari bonan servon al siaj gesinjoroj, kaj tre volonte entreprenis la vojaĝon. Kaj, kiam li estis rajdonta en la vilaĝon de Sancho, li vidis kelke da virinoj, kiuj lavadis sian tolaĵon en rojo. Li demandis al ili, ĉu ili povus informi lin, ĉu en la vilaĝo loĝas virino nomata Teresa Panza, edzino de Sancho Panza, la ŝildisto de kavaliro nomata don Quijote de La Mancha. Ĉe la demando, unu juna lavantino stariĝis kaj diris:

—Teresa Panza estas mia patrino. La tiel nomata Sancho estas mia sinjoro patro, kaj la kavaliro nia mastro.

—Venu do, knabino, kaj gvidu min al via patrino —diris la paĝio—. Mi alportas por ŝi leteron kaj donacon de via patro.

—Tre volonte, sinjoro —respondis la knabino, kiu havis, laŭ sia aspekto, proksimume dek kvar jarojn.

Ŝi lasis sian tolaĵon al kunulino kaj, sen aranĝi al si la harojn aŭ surmeti la ŝuojn, ŝi salte kuris antaŭ la ĉevalo de la paĝio, dirante:

—Venu via moŝto. Nia domo troviĝas en ĉi ekstremo de la vilaĝo. Kaj mia patrino, tre afliktite, sidas hejme, ĉar jam delonge ŝi scias nenion pri mia sinjoro patro.

—Nu, mi alportas al ŝi tiel bonan novaĵon, ke ŝi devos danki Dion —respondis la paĝio.

Fine, saltante, kurante kaj kapriolante, la knabino alvenis al la vilaĝo kaj, antaŭ ol eniri en sian domon, ŝi laŭte vokis de la pordo:

—Venu, patrino Teresa, venu, venu! Ĉi tie estas sinjoro kun leteroj kaj kun aliaj aferoj senditaj de mia bona patro!

Ĉe la voko, Teresa Panza, ŝpinante stupobulon, eliris el la domo en bruna jupo (tiel kurta, ke ĝi ŝajnis tajlita ĉe la nivelo de ŝia honta parto), korsaĵo same bruna kaj kamizolo. Ŝi ne estis olda, kvankam ŝi aspektis pli ol kvardekjara, kaj vidiĝis forta, nerve energia kaj senkarna. Vidante sian filinon kaj la rajdantan paĝion, ŝi demandis:

—Kio okazas? Kiu estas ĉi sinjoro?

—Servisto de mia sinjorino Teresa Panza —li respondis.

Tion dirante, li saltis de sur la ĉevalo, humile genuiĝis antaŭ sinjorino Teresa kaj aldonis:

—Via moŝto permesu, ke mi kisu al vi la manojn, mia sinjorino doña Teresa, leĝa kaj propra edzino de sinjoro don Sancho Panza, gubernatoro de la insulo Barataria.

—Ho sinjoro, ne faru ion tian kaj stariĝu! —respondis Teresa —. Mi estas, ne palaca damo, sed povra kamparanino, filino de plugisto, kaj edzino, ne de gubernatoro, sed de vaganta ŝildisto.

—Via moŝto —klarigis la paĝio— estas la plej digna edzino de superdignega gubernatoro. Kaj kiel pruvo, ke mi diras la veron, jen ĉi letero kaj ĉi donaco.

Kaj tuj sekve li elpoŝiĝis kolieron el koraloj kun oraj ekstremoj, ĝin metis ĉirkaŭ ŝia kolo kaj diris:

—Ĉi letero estas de la sinjoro gubernatoro. Alia letero, kaj la koliero, estas de mia sinjorino la dukino, kiu sendis min al via moŝto.

Teresa gapis de miro, same kiel ŝia filino, kaj ĉi lasta diris:

—Oni min pendumu, se en ĉio ĉi ne intervenis nia sinjoro mastro don Quijote. Certe li donis al mia patro la gubernatoran postenon, aŭ graflandon, kiun li tiel ofte promesis al li..

—Efektive, vi pravas —respondis la paĝio—. Pro konsidero al sinjoro don Quijote oni nomis sinjoron Sancho gubernatoro de la insulo Barataria, kiel vi vidos per ĉi letero.

—Via moŝto ĝin voĉe legu, sinjoro —diris Teresa—, ĉar, kvankam mi scias ŝpini, eĉ ne unu literon mi konas.

—Ankaŭ mi ne —aldonis Sanchica—. Sed atentu ĉi tie. Mi iros voki iun, ke li ĝin legu: la pastron mem aŭ la bakalaŭron Sansón Carrasco. Tre volonte ili venos por scii la novaĵojn pri mia patro.

—Ne necesas voki iun —respondis la paĝio—. Kvankam ni ne scias ŝpini, mi scias legi, kaj legos ĝin.

Kaj efektive, li legis la leteron de la komenco ĝis la fino, sed ĝia teksto, ĉar jam konata, ne reaperas ĉi tie. Poste la paĝio elpoŝiĝis la leteron de la dukino kaj legis jene:

Kara Teresa:

La pozitivaj kvalitoj de boneco kaj talento de via edzo Sancho movis min peti de mia edzo, la duko, ke li donu al li la gubernatorecon de unu el siaj multaj insuloj. Oni informis min, ke li regas plej lerte, kio tre ĝojigas min kaj, cetere, ankaŭ mian sinjoron, la dukon. Tiel do, mi

dankas la ĉielon, ke mi ne trompiĝis, kiam mi elektis lin por la gubernatora posteno: ĉar vi devas scii, sinjorino Teresa, ke en la tuta mondo apenaŭ troveblas bonaj gubernatoroj. Kaj Dio volu, ke mi konduku tiel bone, kiel Sancho kondukas en la regado de sia insulo.

Mi sendas al vi, kara Teresa, kolieron el koraloj kun oraj ekstremoj. Tre plaĉus al mi, se ĝi konsistus el orientaj perloj; sed, kiel oni diras, eĉ eta donaco estas signo de estimo. Iam ni konos unu la alian kaj kreskos inter ni la amikeco, nur Dio scias ĝis kia grado. Salutu de mia flanko vian filinon Sanchica kaj diru al ŝi, ke ŝi estu preta, ĉar mi pensas edzinigi ŝin al bona partio, kaj tio povus okazi plej neatendite.

Oni diris al mi, ke ĉe via vilaĝo kreskas vere dikaj glanoj; sendu al mi du dekduojn da ili, kaj mi tre dankos al vi la favoron, ĉar ĝi venos de viaj manoj. Skribu al mi longe pri via sano kaj aferoj. Kaj se vi ion bezonas, nur parolu... kaj oni vin kontentigos. Dio vin gardu.

En ĉi kastelo. Vin amas, via amikino

La dukino

-Ho! —kriis Teresa, aŭskultinte la legadon de la letero—. Kiel bona, humila kaj senafekta sinjorino! Oni min enterigu kun tiaj damoj, ne kun la hidalginoj ĉi-vilaĝaj, kiuj pensas, ke, pro ilia rango, eĉ ne la vento devas ilin tuŝi, kaj iras al la kirko kun fiere levita kapo, kvazaŭ reĝinoj, eble imagante, ke ili perdis la honoron, se ili rigardus al kampulino. Kaj jen, ĉi bona sinjorino, kvankam dukino, nomas min sia amikino kaj traktas min kiel sam-rangan: mi vidu ŝin tiel alte kiel la plej alta kampanilo de tuta La Mancha! Rilate al la glanoj, kara sinjoro, mi sendos al ŝia dukina moŝto unu buŝelon da ili, tiel dikaj, ke la homoj iros de ĉie por vidi kaj admiri ilin.

Por la momento, Sanchica, bone regalu ĉi sinjoron, priatentu lian ĉevalon, prenu kelke da ovoĵoj el la stalo, detranĉu lardon abunde por fari grivojn kaj preparu al li manĝon indan je princo: li ĉion meritas pro sia bela mieno kaj pro siaj novaĵoj. Dume mi iros rakonti al niaj najbarinoj nian bonan sorton, kaj ankaŭ al la pastro kaj al barbiro majstro Nicolás, ĉar ili ĉiam estis kaj estas bonaj amikoj de via patro.

—Mi faros laŭ via deziro, patrino —respondis Sanchica—. Sed pensu, ke vi devas doni al mi la duonon de la koliero, ĉar sendube mia sinjorino la dukino ne estas tiel stulta sendi ĝin nur al vi.

—Ĝi estos tute via, filino —respondis Teresa—. Sed permesu, ke mi portu ĝin kelke da tagoj, ĉar tio vere ĝojigas al mi la koron.

—Same vi ĝojos, kiam vi vidos kion mi havas en ĉi vojaĝosako —diris la paĝio—. Temas pri vesto el tre delikata ŝtofo, kiun la sinjoro gubernatoro surmetis nur unu fojon por iri ĉasi. Kaj, laŭ liaj instrukcioj, ĝi estas por sinjorino Sanchica.

—Li vivu mil jarojn, kaj lia mesaĝisto same longe —respondis Sanchica—. Kaj eĉ du mil jarojn, se necese.

Ĉe tio Teresa eliris kun la koliero sur la brusto, frapetante per la fingroj sur la leteroj, kvazaŭ sur tamburino. Hazarde, ŝi renkontis la pastron kaj la bakalaŭron Sansón Carrasco, kaj komencis salti, dirante:

—Jen, baldaŭ finiĝos ĉe ni la parencoj senmonaj, ne dubu pri tio. Posteneton gubernatoran ni havas. Nun kuraĝu disdegni min la plej rigid-nuka hidalgino: mi scios fari al ŝi bonan lavon!

—Kio okazas, Teresa Panza? Pri kiaj frenezaĵoj vi parolas kaj kion vi portas en la mano?

—Jen la frenezaĵoj: leteroj de dukinoj kaj gubernatoroj, kaj ĉi koliero el fajnaj koraloj; la «patro-niaj» kaj la «ave-mariaj» estas el prilaborita oro ,^[376] kaj mi estas edzino de gubernatoro.

—Je Dio, Teresa, ni ne komprenas vin. Kion vi volas diri?

—Vidu per vi mem —ŝi respondis.

Ŝi donis al ili la leterojn, la pastro ilin legis al Sansón Carrasco, kaj la du viroj, plenaj de miro ĉe la novaĵo, rigardis unu la alian.

Tiam la bakalaŭro demandis, kiu alportis la leteron, kaj Teresa respondis, ke ili devus akompani ŝin al ŝia hejmo kaj renkonti la mesaĝiston, junulon belan kiel ora broĉo. Ŝi aldonis, ke li alportis ankaŭ alian donacon eĉ pli valoran.

La pastro demetis de ŝia brusto la koralojn, zorge ekzamenis ilin, konvinkiĝis pri ilia aŭtentikeco, miris denove kaj diris:

—Mi ĵuras je mia sutano, ke mi ne scias kion pensi aŭ diri pri ĉi leteroj kaj donacoj. Unuflanke mi vidas kaj tuŝas ĉi vere fajnajn koralojn; aliflanke mi legas, ke dukino deziras, ke oni sendu al ŝi dekduojn da glanoj.

—Vere stranga afero —diris Carrasco—. Sed ni iru vidi la mesaĝiston. Eble li povos klarigi al ni ĉi misteron.

Ili tion faris, akompanate de Teresa, kaj trovis la paĝion, kiam li kribis iom de hordeo por sia ĉevalo, dum Sanchica pretigis grivojn kaj ovojn por la manĝo de la junulo, kies belaj mieno kaj kostumo kaŭzis tre favoran impreson al la du viroj. Post interŝanĝo de ĝentilaj salutoj, Sansón demandis lin pri don Quijote kaj Sancho, kaj aldonis, ke, kvankam ili legis la leterojn de Sancho kaj de la dukino, ili ankoraŭ sentas sin perpleksaj kaj ne povas kompreni, ke Sancho estas

gubernatoro, des malpli de insulo, se konsideri, ke la insuloj en la Mediteraneo apartenas senescepte al lia reĝa moŝto.

—Oni ne dubu, ke sinjoro Sancho Panza estas gubernatoro — respondis la paĝio—. En la afero, ĉu li regas insulon aŭ ne, mi ne opinias; sed sufiĉas diri, ke temas pri loko kun pli ol mil loĝantoj. Rilate al la glanoj, sciu, ke mia sinjorino la dukino estas tiel senafekta kaj simpla, ke ne nur glanojn ŝi petas de kampulino: kelkokaze ŝi sendas iun peti prunte por ŝi kombilon de najbarino ŝia. Sciu, ke la aragonaj damoj, eĉ la plej nobelaj, ne estas tiel fieraj kaj ceremoniaj kiel la kastiliaj, kaj traktas kun pli da afablo la popolon.

Tiam Sanchica aperis kun nombro da ovoĵoj en la supretenata jupo kaj demandis al la paĝio:

—Diru, sinjoro, ĉu mia patro portas kompletan kuloton,^[377] de kiam li gubernatoras?

—Mi ne atentis tion. Sed certe li ĝin portas.

—Ha, Dio! Kiel mi ŝatus vidi lin en remburlita kuloto!^[378] Vere, de kiam mi naskiĝis, mi deziras vidi mian patron tiel vestita.

—Via moŝto sendube vidus lin en tia kuloto, se vi vivos — respondis la paĝio—. Se li okupos sian postenon nur du monatojn, li portos eĉ vojaĝo-maskon.^[379]

La pastro kaj la bakalaŭro baldaŭ komprenis, ke la paĝio ŝercas. Sed la kvalito de la koraloj kaj de la ĉaso-kostumo sendita de Sancho (ĉar Teresa jam montris ĝin al ili) ŝajnis kontraŭi lian ŝercadon. Kaj ili ne povis ne ridi je la deziro de Sanchica, kaj eĉ pli, kiam Teresa diris:

—Sinjoro pastro, bonvolu informiĝi en la vilaĝo, ĉu iu vojaĝos al Madrid aŭ Toledo, ĉar mi deziras komisiu al li la

aĉeton de krinolino ronda, bele tajlita kaj plej bonkvalita. Mi devas laŭpove honori la postenon de mia edzo, kaj eĉ ne estus strange, se mi mem irus al ĉefurbo akiri kaleŝon, kian la ceteraj damoj posedas. Edzino de gubernatoro facile povas aĉeti kaj teni tian veturilon.

—Certe, patrino! —diris Sanchica—. Kaj Dio volu, ke tio okazu hodiaŭ, prefere al morgaŭ, eĉ se la homoj, kiuj vidus min veturi en kaleŝo apud mia patrino, dirus: «Jen la knabinaĉo, filino de ajlo-gluta kampulo, kiel rekte kaj solene ŝi sidas en la kaleŝo, kvazaŭ papino». Sed ili paŝadu en la koto, dum mi sidas en mia veturilo, kaj miaj piedoj ne tuŝas la teron. Al la diablo ĉiuj klaĉuloj de la mondo! Tiel longe kiel mi vivos komforte, ili ridu laŭplaĉe! Ĉu mi ne pravas, patrino?

—Absolute jes! —respondis Teresa—. Mia bona Sancho jam profetis al mi ĉi favorojn de la sorto, kaj eĉ pli grandajn. Kaj vi vidus, filino, ke li ne ripozos ĝis li faros min grafino. Plej grava estas, ke nia bona sorto komenciĝis. Mi ofte aŭdis vian bonan patron diri (kaj li estas, ne nur via patro sed ankaŭ patro de la proverboj), ke «se oni volas doni al vi ringon, tuj preparu la fingron»; do, se oni proponas al vi gubernatoran postenon, prenu ĝin; se oni proponas graflandon, kaptu ĝin tuj; se oni volas vin flati per bona donaco, enmetu ĝin en vian sakon. Estus stulte dormadi kaj ne iri aperti la pordon, kiam la favoroj de la fortuno voke frapas sur ĝin.

—Mi tute ne zorgus —diris Sanchica— se oni dirus, vidante min rigardi fiere kaj dealte: «La hundo vidiĝas en silka kalsono...»^[380] ktp.

—Mi senhezite kredas —diris tiam la pastro—, ke ĉiuj membroj de la familio Panza naskiĝas kun sako de proverboj en la korpo. Eĉ ne unu el ili ĉesas proverbumi ĉiuhore kaj en ĉiuj siaj konversacioj.

—Vi pravas —respondis la paĝio—. La sinjoro gubernatoro tre ofte ilin eldiras kaj, kvankam multaj ne kongruas kun la temo de la konversacioj, tamen ili plaĉas, kaj miaj gesinjoroj la duko kaj la dukino ilin ŝategas.

—Nu, sinjoro, ĉu vi insistas ankoraŭ, ke Sancho fakte estas gubernatoro, kaj ke en la mondo ekzistas dukino, kiu skribas a lia edzino kaj sendas al ŝi donacojn? —demandis la bakalaŭro—. Ni ne povas kredi ion tian, kvankam ni legis la leterojn kaj tuŝis la donacojn. Ni opinias, same kiel opinias nia samlandano don Quijote pri ĉiaj okazintaĵoj, ke ĉio ĉi estas speco de ensorĉo, tiel, ke mi eĉ pensas, ke mi dezirus tuŝi kaj palpi vian moŝton por vidi, ĉu vi estas fantoma ambasadoro aŭ viro el karno kaj ostoj.

—Sinjoroj —respondis la paĝio—, mi scias nur, ke mi estas reala ambasadoro, ke sinjoro Panza efektive gubernatoras, ke miaj gesinjoroj la duko kaj la dukino donis al li tian postenon, kaj ke mi aŭdis diri, ke li admirinde plenumas sian oficon. Viaj moŝtoj diskutu, ĉu en tio ekzistas ensorĉo aŭ ne, sed mi ĵuras je miaj gepatroj, ankoraŭ vivantaj (kaj mi tre amas ilin), ke mi diris nur kion mi scias.

—Povas esti —respondis la bakalaŭro—, sed *dubitat Agustinus*.^[381]

—Dubu kiu ajn, mi diris nur la veron —daŭrigis la paĝio—, kaj la vero ĉiam leviĝas super la mensogo, kiel oleo sur akvo. Kaj se ne, *operibus credite et non verbis*:^[382] unu el viaj moŝtoj akompanu min kaj vidos per la okuloj kion vi ne kredas per la oreloj.

—Tia vojaĝo koncernas min —diris Sanchica—. Sinjoro, portu min sur la grupo de via ĉevalo. Mi iros tre volonte viziti mian sinjoron patron.

—La filino de la gubernatoroj devas iri, ne solaj sur la vojoj, sed akompanataj de kaleŝoj, portoseĝoj kaj granda nombro da servistoj.

—Je Dio —respondis Sanchica—. Mi povas iri same bone sur azeno kiel en kaleŝo. Ne opiniu min tiel delikataĉa!

—Silentu knabino —ordonis Teresa—. Vi ne scias kion vi diras. Ĉi sinjoro pravas. Laŭ la sezono, konduku la persono; kiam Sancho, Sancha; kiam gubernatoro, sinjorino. Ĉu mi ne pravas?

—Pli ol vi imagas —diris la paĝio—. Sed bonvolu doni al mi la manĝon nun, ĉar mi deziras ekiri returne en ĉi posttagmezo.

—Prefere venu pentofari kun mi^[383] —invitis la pastro—. Sinjorino Teresa havas pli da bona volo ol da rimedoj por regali tiel distingitan gaston.

La paĝio rifuzis unuamomente la inviton de la pastro, sed fine cedis je la profito de sia stomako. La pastro tre volonte prenis lin kun si, tial, ke li havus la okazon detale demandi lin pri don Quijote kaj ties faroj.

De sia flanko la bakalaŭro sin proponis al Teresa por skribi ŝiajn respondajn leterojn; sed ŝi ne volis, ke la bakalaŭro miksiĝu en ŝiajn aferojn, ĉar ŝi opiniis lin iom tro ŝercema. Tiel do ŝi donacis bulkon kaj paron da ovoj al mesknabo scianta skribi, kaj li skribis du leterojn, unu por ŝia edzo, la alian por la dukino. Ŝi ilin diktis el sia propra kapo, kaj, kiel ni poste vidos, ambaŭ leteroj tute ne estas la plej mavaj el la aperantaj en ĉi granda historio.

[376] Dum la trapreĝado de la katolika rozario, kiam oni atingis bidojn pli grandajn aŭ iom apartigitajn de la ceteraj, oni devas diri la menciitajn preĝojn. Ŝajnas do, ke la koliero de Teresa havis ankaŭ la funkcion utili kiel rozario.

[377] La ordinara kuloto atingis ĝis la genuo. La kompleta kuloto, pli strikta, longis preskaŭ kiel moderna pantalono.

[378] La kompletan kuloton oni kelkfoje remburis, ĉefe la elegantuloj, por ke la korpo ne aspektu tro minca. Oni memoru la grasan figuron de Sancho, kaj la komento de Sanchica vidiĝos des pli ridiga.

[379] Nur nobeloj kaj gravuloj portis ĝin por laŭeble eviti polvon kaj venton dumvoje.

[380] La dua parto de la proverbo diras: «kaj tiam ĝi ignoras sian kompanon».

[381] Latine: «Augusteno dubis». Iam en la teologiaj disputoj inter studentoj, kutima frazo por esprimi nekredemon pri io.

[382] «Kredu la farojn, se ne la vortojn». Latina sentenco aperanta ankaŭ en la ĉapitro 25-a de la dua parto.

[383] Humure, «pentofari» anstataŭ «manĝi».

Ĉapitro 51

Pri la daŭrigo de la regado de Sancho kaj pri aliaj eventoj legindaj

Venis la aŭroro post la nokto de la gubernatora rundo; nokto, kiun la butlero pasigis sen dormi, ĉar lian penson okupis la vizaĝo, la gracio kaj la belo de la alivestita pucelo, dum la majordomo sin dediĉis ĝis la mateniĝo skribi al siaj gesinjoroj pri la faroj kaj diroj de Sancho Panza, mirante tiel je liaj vortoj kiel je liaj agoj, ĉar en ili miksiĝis la stulto kun la saĝo.

Nu, la sinjoro gubernatoro fine ellitiĝis kaj, laŭ ordono de doktoro Pedro Recio, oni igis lin matenmanĝi iom da konfitaĵo kaj kvar glutojn da frida akvo. Sancho volonte estus tion ŝanĝinta por peco da pano kaj grapolo da uvoj. Sed li komprenis, ke li devas cedi vole-nevole, do li submetiĝis al tia dieto kun profunda kor-doloro kaj kun granda ĉagreno de sia stomako. Pedro Recio provis konvinki lin, ke la manĝoj delikataj kaj etkvantaj vigligas la talenton, kaj ke tio plej konvenas al homoj ŝarĝitaj per gravaj kaj aŭtoritataj oficoj, kie pli necesas la forto de la menso ol la forto de la korpo.

Per tiaj sofismoj oni tenis Sanchon malsata, tiom, ke en la fundo de sia koro li sendadis al la diablo la gubernatorecon kaj eĉ la personon, kiu ĝin havigis al li. Tamen, kun sia konfitaĵo kaj sia malsato, ankaŭ tiun tagon li sidiĝis por juĝi, kaj la unuan kazon submetis al li la fremdulo en la ĉeesto de la majordomo kaj de la ceteraj personoj de la grupo, dirante:

—Sinjoro, unu granda rivero dividas en du partojn la bienon de moŝtulo. (Via moŝto atente aŭskultu, ĉar temas pri afero

grava kaj iom komplika). Nu, ĉi riveron krucas unu ponto, ĉe kies ekstremo staras pendingo kaj speco de juĝejo, kie ordinare kvar juĝistoj verdiktas laŭ la jena leĝo starigita de la mastro de la rivero, de la ponto kaj de la bieno: «Antaŭ ol ajna persono trairos la ponton, unue li devas ĵure deklari, kien li volas iri kaj por kio; se li ĵure diras la veron, oni lasu lin pasi; sed, se li mensogas, oni pendumu lin ĝismorte sur la pendingo».

»Multaj konas la severon de ĉi leĝo, sed iras pasi la ponton, kaj la juĝistoj, konstatante, ke ili diras la veron, tuj lasas ilin libere pasi. Nu, okazas, ke iam prezentiĝis unu viro kaj ĵure deklaris al la juĝistoj, ke li iras morti ĉe la pendingo tiea, kaj ke li ne havas alian projekton. La juĝistoj meditis pri lia ĵuro kaj diris: «Se ni lasus ĉi homon libere pasi, tiam lia ĵuro estus falsa kaj, laŭ la leĝo, li devus morti; kaj, se ni kondamnas lin, evidentiĝus la vero de lia ĵuro kaj sekve, laŭ la leĝo, li devus pasi libere». Ni demandas al via moŝto, sinjoro gubernatoro, kion devas fari la juĝistoj rilate al ĉi homo, ĉar ili sidas ĝis nun perpleksaj kaj sen fari decidon. Kaj kiam ili aŭdis pri la granda kaj subtila saĝo de via moŝto, ili sendis min supliki al vi, de ilia flanko, ke vi donu vian opinion pri tiel implikita kaj hezitiga afero.

—Vere —respondis Sancho— la sinjoroj juĝistoj povintus eviti al si la ĝenon sendi vin al mi, ĉar mi estas homo pli stulta ol subtila. Sed ripetu al mi la aferon, ke mi ĝin komprenu bone: eble mi povus trafi hazarde la ĝustan klavon.

La alia ripetis la rakonton kaj Sancho diris:

—Ŝajnas al mi, ke ĉi aferon oni povas resumi jene: la viro ĵuras, ke li mortos ĉe la pendingo; kaj, se, efektive tiel, lia ĵuro veris kaj, laŭ la leĝo, li devus libere pasi la ponton. Kaj,

laŭ la sama leĝo, se oni ne pendumus lin, li false ĵuris, kaj li devus esti pendumita, ĉu ne?

—Ĝuste tiel, sinjoro gubernatoro —respondis la alia—. Nenio mankas al via kompreno kaj interpreto de la kazo.

—Tiel do —daŭrigis Sancho— la viron oni dividu en du partojn: la veran kaj la mensogan; la unuan oni lasu pasi; la duan oni pendumu kaj tiamaniere oni laŭlitere obeos la leĝon.

—Sed, sinjoro gubernatoro —respondis la demandato—. Se oni dividus la viron en la du menciitajn partojn, li nepre mortus, kaj tiam la leĝon oni ne tute observus. Kaj la leĝo estas obeenda.

—Nu, sinjoro bonulo, aŭskultu —respondis Sancho—. Aŭ mi estas stulta, aŭ via vojaĝanto havas la saman motivon tiel por morti kiel por vivi kaj pasi la ponton, ĉar, se la vero lin savas, la mensogo lin kondamnas; se tiel, kaj efektive tiel estas, vi devas, laŭ mia opinio, informi al la sinjoroj vin sendintaj, ke tial, ke teniĝas en egala ekvilibro la motivoj por lin kondamni aŭ absolvi, la juĝistoj devas lasi lin libere pasi, ĉar ĉiam pli rekomendindas fari bonon ol mavon. Cetere, ĉi-okaze mi ne parolis per propra ideo: mi memoris unu el la multaj preceptoj, kiujn mia mastro don Quijote donis al mi en la nokto antaŭa al mia vojaĝo ĉi tien. Tia precepto diras, ke kiam la justeco hezitas, oni inklinu al la flanko de la pardono. Kaj Dio volis, ke mi memoru ĝin, kiu tiel bele konvenas al ĉi kazo.

—Efektive —diris la majordomo—. Kaj mi opinias, ke eĉ Likurgo mem, leĝodoninto de la lacedemonanoj, ne kapablus fari decidon pli bonan ol la ĵusa verdikto de la granda Sancho. Kaj nun, finiĝu per tio la ĉi-matena aŭdienco. Mi

ordonos, ke oni surtabligu al la gubernatoro manĝon tute laŭ lia plaĉo.

—Tion mi volas, kaj ke tiel okazu, sen ia trompo —respondis Sancho—. Se oni donas al mi manĝon, ne gravas, ĉu falos sur min kazoj kaj problemoj: mi facile forblovos ilin en la aeron.

La majordomo tenis sian parolon, ĉar ŝajnis al li, ke mortigi de malsato tiel saĝan gubernatoron pezus sur lia konscienco. Krome li pensis meti finon al lia gubernatora rolo per la lasta mistifiko, kiun laŭkomisie li devus fari al Sancho tiun saman nokton.

Nu, okazis, ke Sancho manĝis kontraŭ ĉiaj reguloj kaj aforismoj de doktoro Tirteafuera, kaj en la momento, kiam oni prilevis la tablon, eniris mesaĝisto kun letero de don Quijote por la gubernatoro. Sancho ordonis la sekretarion legi ĝin por si kaj aldonis, ke, se nenio sekreta sidas en ĝi, li legu ĝin voĉe. La sekretario tion faris kaj, rapide trarigardinte la skribaĵon, diris:

—Oni povas ĝin legi voĉe. Kion sinjoro don Quijote skribas al via moŝto meritas esti gravurita per oraj literoj. Tiel ĝi tekstas:

Letero de don Quijote de La Mancha al Sancho Panza, gubernatoro de la insulo Barataria

Kiam mi atendis, amiko Sancho, aŭdi novaĵojn pri viaj neglektoj kaj absurdoj, oni informis min pri via saĝa konduto, kaj mi dankas al Dio, ĉar Li scias levi de la sterko la paŭperajn kaj turni la stultajn en prudentajn. [384] Oni diris al mi, ke vi regas kvazaŭ homo, kaj ke, kvankam homo, vi ŝajnas besto pro via humila maniero trakti vin mem. Mi volas, ke vi sciu, Sancho, ke pro la

aŭtoritato de la posteno, ofte necesas kaj konvenas kontraŭi la humilon de la propra koro, ĉar la konduto de persono okupanta gravan oficon devas kongrui kun la postuloj de la posteno, ne kun la inklinoj de lia humila naturo. Portu bonan veston: bastono ornamita ne ŝajnas bastono. Mi volas diri, ne ke vi kovru vin per juveloj kaj luksaĵoj, aŭ ke, en via karaktero de gubernatoro, vi aperu en soldata vesto, sed ke vi portu kostumon propran al via ofico, ĉiuokaze puran kaj decan.

Por gajni al vi la bonvolon de viaj regatoj faru, interalie, du aferojn: ĝentili al ĉiuj, kion mi jam diris al vi alifoje. Kaj zorgi, ke ĉiam ekzistu abundo de provizoj, ĉar nenio ĉagrenas la koron de la paŭperaj pli ol la malsato kaj la manko.

Ne faru multe da dekretoj. Se jes, klopodu fari ilin bonaj, kaj ĉefe zorgu, ke oni ilin respektu kaj obeu: ĉar la dekretoj, se ignorataj, egalas al dekretoj ne ekzistantaj, kaj eĉ montras, ke la princo kun saĝo kaj aŭtoritato sufiĉaj por ilin dikti, ne havis la kuraĝon trudi ilin. Kaj leĝoj imponaj, sed ne plenumataj, similas al la trabo, reĝo de la ranoj:^[385] komence ĝi ilin teruris, sed, kun la paso de la tempo, la ranoj perdis al ĝi la respekton kaj eĉ saltis sur ĝin.

Konduitu kiel patro al la virtoj, kaj kiel duonpatro al la pekoj. Ne ĉiam estu tro severa aŭ tro cedema kaj elektu la mezon inter la du ekstretoj, ĉar en tio konsistas la saĝo.

Faru viziton al la karceroj, buĉejoj kaj bazaroj: la ĉeesto de la gubernatoro en tiaj lokoj tre gravas, ĉar ĝi donas konsolon al la prizonuloj —kiuj esperas baldaŭan liberigon—, fantomas en la koro de la buĉistoj —kiuj tiam ekuzas pro singardo laŭregulajn pezilojn— kaj

metas timon inter la bazarvendistinoj pro la sama motivo.

Se okaze vi estus mon-ama, virin-ĉasa aŭ manĝ-avida (kion mi ne kredas) ne montru vin tia, ĉar se via popolo kaj viaj proksimuloj konus vian ĉefan inklinon, ili koncentrus sian artilerion sur ĝin, ĝis ili sendus vin al via kompleta pereco. Konsideru fojon post fojo kaj legu re kaj re la nombron da konsiloj kaj instrukcioj, kiujn mi skribis donis al vi, antaŭ ol vi ekiris okupi vian gubernatoran postenon, kaj vi vidus, se vi ilin obeos, ke ili tre helpos vin en la komplikoj kaj problemoj renkontataj de la gubernatoroj.

Skribu al viaj gesinjoroj kaj montru vin danko al ili, ĉar nedankemo naskas orgojlon, t.e. unu el la plej gravaj pekoj konataj. Krome, la persono danko al siaj bonfarantoj pensigas, ke li montros sin danko ankaŭ al Dio pro Liaj multaj favoroj iamaj kaj nunaj.

La sinjorino dukino sendis mesaĝiston transdoni vian kostumon kaj alian donacon al via edzino Teresa Panza; ŝian respondon ni atendas jam baldaŭ. Mi fartis ne tre bone kaŭze de ia katumado trafinta min, ĉefe mian nazon, sed temas pri apenaŭ menciinda afero, ĉar, se ekzistas sorĉistoj, kiuj min mistraktas, aliaj min defendas. Sciigu min, ĉu via majordomo havis ian rilaton kun la afero de Trifaldi, kiel vi siatempe suspektis, kaj informu min pro ĉio al vi okazanta (se konsideri, ke la distanco inter ni tute ne longas) des pli, ke mi intencas baldaŭ forlasi ĉi pigran vegetadon, tute kontraŭan al mia vivo-stilo.

Prezentiĝis unu afero, kiu, mi kredas, igos min perdi la favoron de la gedukoj. Sed kvankam tio donas al mi multe da zorgo, finfine tamen ne gravas, ĉar mi devas

pensi pri la devoj de mia profesio antaŭ ol pri la kontentigo de la gedukoj laŭ la diro: «Amicus Plato, sed magis amica veritas».^[386] Mi diras tion en la latina lingvo, ĉar sendube vi lernis ĝin, de kiam vi estas gubernatoro. Kaj Dio volu, ke neniuj vin kompatu. Via amiko,

Don Quijote de La Mancha

Sancho aŭskultis tre atente la leteron, kaj la ceteraj ĉeestantoj ĝin laŭdis pro ties saĝaj esprimoj. Poste li leviĝis de la tablo, vokis la sekretarion, enfermis sin kun li en sia ĉambro, volis tuj respondi al sia mastro kaj petis la sekretarion skribi laŭ lia diktado, sen aldoni aŭ depreni ion. La sekretario faris kiel dirite, kaj la responda letero tekstis jene:

Letero de Sancho Panza al don Quijote de La Mancha

Miaj aferoj tiel premas min, ke mi ne havas tempon por grati mian kapon aŭ eĉ por tondi al mi la ungojn, do ili tiom kreskas, kiom Dio volas. Mi diras tion, kara mastro, por ke via moŝto ne surpriziĝu, ke ĝis nun mi sendis al vi nenian informon pri mia stato, bona aŭ mava, en ĉi gubernatora posteno, kie mi malsatas pli ol kiam ni ambaŭ vagadis tra arbaroj kaj dezertoj.

Antaŭ kelkaj tagoj mia mastro, la duko, skribis al mi por min sciigi, ke certaj spionoj enŝtelis sin en la insulon kun la intenco mortigi min, sed ĝis nun mi eltrovis neniun, krom ia doktoro pagata por ke li mortigu de malsato tiom da gubernatoroj kiom da ili alvenas al la insulo. Li nomiĝas doktoro Pedro Recio kaj naskiĝis en Tirteafuera. Via moŝto vidu do, se tia nomo ne donas motivon por timi, ke mi mortos inter liaj manoj. Ĉi doktoro asertas pri

si mem, ke li ne kuracas la malsanojn, kiam ili prezentiĝas, sed ke li preventas ilian ekeston, kaj, kiel medicinon, li preskribas dieton super dieto ĝis la paciento reduktiĝas al nura skeleto, kvazaŭ la senkarneco ne estus pli grava malsano ol la febro. Unuvorte, li pereigas min de malsato, kaj mi mortas de ĉagreno, ĉar mi pensis, ke en ĉi posteno mi povus preni varmajn manĝojn kaj fridajn trinkojn kaj dorloti min sur plumaj matracoj kaj inter lito-tukoj holandaj. Sed jen, mi pentofaras kiel ermito, ne volonte, kompreneble, kaj pensas, ke finfine la diablo prenos min kun si.

Ĝis nun oni ne provis korupti aŭ subaĉeti min per mono, kaj tion mi ne komprenas, ĉar oni diris al mi ĉi tie, ke ordinare la gubernatoroj destinitaj al ĉi insulo ricevas, eĉ antaŭ ol ili okupas la postenon, multe da mono, ĉu kiel donaco, ĉu kiel prunto, de la homoj de la vilaĝo; kaj ke tian kutimon faras al si la novaj gubernatoroj, ne nur ĉi tie, sed ĉie.

Hieraŭ nokte, rundante, mi renkontis tre belan pucelon en vira vesto kaj ŝian fraton en virina robo. La butlero enamiĝis al la knabino kaj en sia penso elektis ŝin kiel sian edzinon, laŭ sia propra konfeso, kaj mi elektis la knabon kiel bofilon. Hodiaŭ mi kaj la butlero parolos pri nia decido al ilia patro, nomata Diego de la Llana, oldkristano kaj hidalgo kiom oni povus deziri.

Mi vizitas bazaron, laŭ konsilo de via moŝto, kaj hieraŭ mi renkontis virinon, kiu vendadis avelojn, sed mi konstatis, ke ŝi antaŭe miksis buŝelon da freŝaj kun alia da oldaj, senkernaj kaj putraj. Mi ordonis sendi la tuton al la lernejoj, ĉar ili scias distingi la bonajn de la mavaj, kaj prohibis, ke ŝi aperu en la bazaro dum dek kvin tagoj. Oni diris al mi, ke mi faris tre bone; via moŝto sciu, ke, laŭ famo cirkulanta en ĉi vilaĝo, ne ekzistas pli

mavaj personoj ol la bazaristinoj; ili ĉiuj estas senhontaj, malicaj kaj insolentaj; kaj tion mi kredas, se konsideri mian ĉi-rilatan sperton en aliaj vilaĝoj.

Mi tre kontentas, ke mia sinjorino la dukino skribis al mia edzino Teresa Panza kaj sendis la donacon menciitan de via moŝto. Siatempe mi montros al ŝi mian dankemon. Via moŝto kisu al ŝi la manojn, je mia nomo, kaj diru al ŝi, ke mi diras, ke ŝia bonvolo ne estos forgesita, kiel ŝi vidos pro miaj faroj.

Ne plaĉus al mi, se vi havus ian disputon kun miaj sinjoroj la gedukoj, ĉar, se via moŝto kverelus kun ili, nenio bona rezultus por mi. Kaj ne estus juste, se vi, kiu konsilis min montri min dankema, de via flanko kondukus nedanke al la persono farinta al vi tiom da favoroj kaj senrezerve vin regalanta en sia kastelo.

Mi ne komprenas tion pri la «katumado», sed mi imagas, ke vi aludas ajnan el la multaj kanajlaĵoj kutime plenumataj de la malicaj sorĉistoj kontraŭ vin. Kiam ni renkontiĝos, mi scios pri kio temas.

Mi dezirus sendi donacon al via moŝto, sed mi ne scias kion, se ne kelke da kuriozaj klistero-tuboj, kiajn oni faras, kun ties vezikoj, en ĉi insulo. Tamen, se mia ofico daŭros, iel ajn mi trovos kion sendi al vi.

Se mia edzino skribos al mi, bonvolu pagi la porton de la letero kaj sendi ĝin al mi. Mi ege deziras scii, kiel statas mia hejmo, mia edzino kaj miaj filoj. Nu, Dio gardu vian moŝton kontraŭ misvolaj sorĉistoj, kaj Li elkonduku min sekura kaj sana el ĉi gubernatora posteno, kion mi dubas, ĉar, se konsideri, kiel min traktas doktoro Pedro Recio, mi perdos en ĝi la vivon.

Servisto de via moŝto

Sancho Panza, gubernatoro

La sekretario sigelis la leteron kaj tuj forsendis ĝin kun la mesaĝisto. Poste la mistifikantoj de Sancho kunvenis kaj projektis la manieron meti finon al lia gubernatoreco. Dume, Sancho pasis tiun saman vesperon diktante kelke da leĝoj por la pli bona regado de tio, kion li imagis insulo, kaj ordonis, ke oni ne akaparu la provizojn en la regno, kaj ke oni enportu vinon de ĉie ajn, kondiĉe, ke oni deklaru ĝian lokon de origino, kun la celo determini ĝian prezon laŭ ĝia valoro, kvalito kaj famo. Kaj se iu baptus ĝin aŭ ŝanĝus ĝian nomon, li estus kondamnita je morto. Li ordonis ankaŭ redukti la prezon de la pied-vestoj, ĉefe de la ŝuoj, ĉar ŝajnis al li, ke ili tro karas. Li fiksis la salajron de la servistoj, ĉar ĝi leviĝadis senhalte. Li altrudis tre severajn punojn kontraŭ la kantantoj —en la nokto aŭ en la tago— de kanzonoj trivialaj aŭ obscenaj kaj dekretis, ke la blinduloj ne kantu koplojn pri mirakloj, se ili ne portas kun si nerebateblan pruvon rilate al ilia aŭtentikeco, ĉar, laŭ lia opinio, tiaj prikantitaj mirakloj estas pliparte falsaj kaj iel diskreditas la verajn. Li kreis la oficon de inspektisto de la paŭperaj, ne por ilin persekuti, sed kun la celo esplori, ĉu ili fakte estas tiaj, ĉar, sub la kovro de ŝajnaj brako-mutiloj aŭ de falsaj ulceroj, kaŝiĝas ŝtelistoj kaj tute sanaj drinkuloj. Unuvorte li diktis tiom da laŭdindaj leĝoj, ke ĝis nun oni ilin observas tie sub la nomo de «reglamentoj de la granda gubernatoro Sancho Panza».

[384] El la Biblio, parte el Psalmaro 113,7.

[385] Laŭ konata fablo, la ranoj petis de Jupitero reĝon. Tiam Jupitero ĵetis trabon en ilian basenon, la ranoj teruriĝis sed iom post iom perdis la timon kaj eĉ kutimiĝis koti sur la trabon.

[[386](#)] Proverba esprimo, latine: «Amiko de Platono, sed eĉ pli de la vero».

Ĉapitro 52

Kie oni rakontas la aventuron pri la duenjo Dolorida aŭ Afliktita, alinome doña Rodríguez

Rakontas Cide Hamete ke, kiam don Quijote resaniĝis de siaj grataĵoj kataj, li pensis, ke li vivas en la kastelo kontraŭ ĉiaj reguloj de sia ordeno kavalira. Tiel do, li decidis peti de la gedukoj ties permeson por ekiri al Zaragoza, kies festoj jam proksimiĝis, kaj kie li esperis gajni la armaĵon, kiun oni kutime donas kiel trofeon al la venkinto en la festaj turniroj.

Unu tagon, kiam li sidis kun la gedukoj ĉe la tablo kaj komencis vortigi sian ideon peti de ili la forpermeson, nu, subite, tra la pordo de la granda salono enpaŝis du virinoj — oni vidis poste, ke ili estas virinoj— kovritaj per longaj funebraj vualoj de la kapo ĝis la piedoj. Unu el ili aliris al don Quijote, ĵetis sin tute sur la plankon kaj, kun la lipoj ĉe liaj piedoj ekĝemis tiel profunde, triste kaj dolore, ke la ĉeestantoj konsterniĝis. Kaj, kvankam la gedukoj pensis, ke tio sendube estas alia mistifiko preparita de iliaj servistoj kontraŭ don Quijote, tamen ambaŭ dubis kaj perpleksis, vidante, kiel korŝire la virino suspiras, ĝemas kaj ploras. Fine, la hidalgo, kompatema, levis ŝin de la planko kaj petis ŝin demeti la vualon de sur sia larva vizaĝo. Ŝi obeis kaj rivelis ion tute nepenseblan: la vizaĝon de la duenjo doña Rodríguez. La alia virino en funebro estis ŝia filino, la junulino trompita de la filo de la riĉa kampulo. Kiuj konis la duenjon stuporis, ĉefe la gedukoj, ĉar, kvankam ili konsideris ŝin naiva kaj duonstulta, ne imagis ŝin kapabla fari frenezaĵon. Fine doña Rodríguez turnis sin al siaj gesinjoroj kaj diris:

—Viaj ekscelencaj moŝtoj bonvolu, ke mi parolu duope kaj aparte kun ĉi kavaliro, ĉar tio necesas, por ke mi eltiru min el la mava situacio, kie mi troviĝas pro la insolento de perfida fripono.

La duko donis sian konsenton kaj aldonis, ke ŝi povas paroli kun sinjoro don Quijote, tiel longe kiel plaĉos al ŝi. Ŝi turnis sian vizaĝon kaj sian voĉon al la hidalgo kaj diris:

—Ankaŭ kelkaj tagoj, kuraĝa kavaliro, mi informis vin pri la infamia perfidaĵo de malica kampulo kontraŭ mia kara, tre amata filino, kiu jen staras ĉi tie. Vi promesis okupiĝi pri ŝia misfortuno, kaj igi ripari la ofendon al ŝi faritan, sed nun venas al mi la sciigo, ke vi volas forlasi ĉi kastelon, serĉe al aventuroj al vi rezervataj de la bona Dio. Tiel do mi dezirus ke, antaŭ ol vi forperdiĝos sur la vojoj, vi defiu la obstinan ulon kaj devigu lin edziĝi al mia filino, kiel li promesis, antaŭ ol li kuŝis kun ŝi; ĉar pensi, ke mia sinjoro la duko farus al mi juston egalas peti de ulmo pirojn, pro la motivoj, kiujn siatempe mi sciigis al vi. Nu, Dio donu solidan sanon al via moŝto, kaj Li ne lasu min sen protekto.

Al tio respondis don Quijote emfaze kaj solene:

—Bona duenjo, moderigu vian ploron, aŭ pli ĝuste, viŝu la larmojn kaj ŝparu la suspirojn: mi surprenas solvi la problemon de via filino, kvankam ŝi ne devintus tiel leĝere kredi amĵurojn, preskaŭ ĉiam facile direblajn sed tre malvolonte plenumatajn. Nu, kun la permeso de mia sinjoro la duko, mi tuj iros serĉi tiun senprincipan junulon, renkontos kaj defios lin, kaj lin mortigos, se li rifuzos plenumi sian parolon: ĉar la ĉefa celo de mia profesio estas pardoni la humilajn kaj puni la orgojlajn, mi volas diri, helpi la mizerajn kaj detruji la kruelajn.

—Ne necesas —respondis la duko—, ke via moŝto faru al vi la ĝenon serĉi la kampulon, pri kies konduto ĉi bona duenjo plendas. Mi konsideras lin kiel jam defiitan kaj prenas sur min komuniki al li la defion, por ke li akceptu la duelon, prezentu sin en ĉi kastelo kaj respondu per si mem. Ĉi tie mi disponigos adekvatan kampon, observante la regulojn proprajn al ĉi defioj, kaj traktante vin ambaŭ per la sama senpartia justo, kiel devas fari la princoj kiam ili cedas en siaj regnoj la duelkampon al defiantoj.

—Nu, do, kun tia certigo kaj kun la permeso de via ekscelenco —diris don Quijote— mi deklaras ke, ĉi-foje, mi flankklaras mian hidalgecon, descendas al la ofendinto kaj fariĝas lia egalulo, por ke li povu batali kontraŭ mi. Tiel do, kvankam li forestas de ĉi tie, mi provokas kaj defias lin, tial ke li malice trompis kompatindan knabinon, kiu ne plu estas pucelo pro lia kulpo. Do, aŭ li tenos sian parolon, laŭleĝe edziĝante al ŝi, aŭ li pereos en la duelo.

Poste don Quijote detiris unu ganton, ĵetis ĝin en la mezon de la salono, kaj la duko ĝin prenis, dirante, ke, kiel menciite, li akceptas la defion je la nomo de sia servutulo, kaj ke la duelo okazos post ses tagoj en la korto de lia kastelo. Li aldonis, ke estos uzataj, sen artifiko, trompoj aŭ superstiĉaj talismanoj, la bataliloj propraj el la kavaliroj: lanco, ŝildo kaj kompleta armaĵo, kaj ke ilin ekzamenos kaj kontrolos la duelo-juĝantoj.

—Sed unue —daŭrigis la duko— necesas, ke ĉi bona duenjo kaj ĉi mava knabino cedu sian rajton en la manojn de don Quijote; alie, ĉio vanus, kaj la defio ne povus efektiviĝi.

—Mi ĝin cedas —respondis la duenjo.

—Ankaŭ mi —aldonis la filino honte, ekscitite kaj kun la vizaĝo plena de larmoj.

Post ĉi formalajfo, kaj dum la dukino pensis, kiel li aranĝos la disvolvon de la afero, la du virinoj en funebro eliris, kaj la dukino ordonis ke, de tiu momento, ili estu traktataj, ne kiel servistinoj de la palaco, sed kiel vagantaj damoj venintaj peti juston ĉe ŝi. Tiel ke oni disponigis al ili specialan ĉambron kaj servis ilin kvazaŭ fremdajn gastojn, ĉe la granda miro de la aliaj ĉambristinoj, nekapablaj imagi, ĝis kia ekstremo irus la stulto kaj la aŭdaco de doña Rodríguez kaj de ties misvaginta filino.

Ĉe tio, kvazaŭ por kroni per ĝojo la spektaklon kaj meti agrablan finon al la manĝo-horo, subite eniris en la salonon la paĝio portinta la leterojn kaj donacojn al Teresa Panza, edzino de la gubernatoro Sancho Panza. Ĉe lia reveno tre ĝojis la gedukoj, ĉar ili tre deziris scii la novaĵojn de lia vojaĝo. Demandite ĉi-rilate, la paĝio respondis, ke li ne devus raporti publike kaj per resumaj vortoj; ke iliaj ekscelencoj eble bonvolus atendi ĝis li povus paroli private kun ili, kaj ke, dume, ili povus distri sin per la leteroj. Kaj, elpoŝiginte la du, li ilin transdonis al la dukino. La adreso de la unua tekstis: «Letero por mia sinjorino Tia de mi ne scias kie», kaj la alia: «Al la gubernatoro de la insulo Barataria, mia edzo Sancho Panza, kies vivon Dio longigu pli ol la mian».

Kiel ordinare diras, la dukino sidis sur pingloj, en sia deziro legi ŝian leteron. Ŝi ĝin apertis, traokulis ĝin, vidis, ke ŝi povas ĝin legi voĉe al la dukino kaj al la ceteraj ĉeestantoj, kaj laŭtis:

Letero de Teresa Panza al la dukino

La letero de Via Grandeco, kara sinjorino, donis al mi multe da plezuro, ĉar vere mi tre deziris ĝin ricevi. La koral-koliero estas tre bona, kaj la ĉas-kostumo de mia edzo ne-malpli bona. La tuta vilaĝo ĝojas, ke via

sinjorina moŝto faris mian edzon gubernatoro, kvankam neniu kredas tion, precipe la pastro, la barbiro majstro Nicolás kaj la bakalaŭro Sansón Carrasco; sed ilia opinio tute ne tuŝas min, ĉar se lia gubernatoreco veras —kaj ĝi efektive veras— ili povas paroli laŭplaĉe. Tamen mi konfesas, ke, se mi ne vidus la kolieron kaj la kostumon, ankaŭ mi ne kredus, ĉar la tuta vilaĝo konsideras mian edzon stulta, kaj ne imagas lin kapabla regi ion, se escepti gregon da kaprinoj. La ĉielo lin rekte gvidu por la bono de liaj infanoj!

De mia flanko, karega sinjorino, mi havas la ideon, kun via permeso, profiti la okazon, t.e. iri al la ĉefurbo paradi en kaleŝo, por ke suferu la okuloj de la multegaj personoj, kiuj jam envias vin. Tiel do mi suplikas, ke via ekscelenca moŝto ordonu mian edzon sendi al mi iom da mono, pli ĝuste, sufiĉe da iom, ĉar en la ĉefurbo oni devas multe elspezi: panbulo kostas unu realon kaj funto de viando tridek maravedojn... terure! Kaj se mia edzo ne volas, ke mi iru tien, sciigu min ĝustatempe, ĉar miaj piedoj jam volas peli sin sur la vojo. Miajamikinoj kaj najbarinoj diras, ke se ni cirkulus pompe kaj parade en la ĉefurbo, mian edzon oni konus per mi, pli ol min per li, ĉar multaj demandus: «Kiuj estas la damoj tie en la kaleŝo?», kaj unu el miaj lakeoj respondus: «La edzino kaj la filino de Sancho Panza, gubernatoro de la insulo Barataria». Tiel Sancho estus konata, kaj mi estimata. Do... al la ĉefurbo! Mi plej bedaŭras, ke ĉi-jare ni ne havis rikolton de glanoj. Tamen mi sendas al via majesta moŝto proksimume duonbuŝelon da ili: mi mem iris al la monto elekti kaj pluki ilin, unu post la alia, kaj ne trovis pli grandajn: mi dezirus ilin tiel grandaj kiel strutaj ovo.

Via pompa moŝto ne forgesu skribi al mi; certe mi respondos al vi kun informoj pri mia sano kaj pri ĉio direnda pri ĉi vilaĝo, kie mi restas, preĝante al Dio, ke li

gardu vian moŝtecon, kaj ke Li ne forgesu min. Mia filino Sancha kaj mia filo kisas la manon de via moŝto.

Via servistino, kies deziro estas vidi vin, pli ol skribi.

Teresa Panza

La letero de Teresa Panza donis grandan plezuron al ĉiuj, precipe al la gedukoj. La dukino demandis al don Quijote, ĉu licus aperti la leteron adresitan al la gubernatoro, kaj aldonis, ke certe ĝi estas bonega. La hidalgo respondis ke, por komplezi ilin, li apertos la leteron. Tion li faris kaj legis la jenon:

Letero de Teresa Panza al ŝia edzo Sancho Panza

Mi ricevis vian leteron, kara Sancho, kaj je mia katolika kaj kristana fido, mi asertas kaj ĵuras, ke nur iometo, apenaŭ du fingroj, mankis al mi por freneziĝi de ĝojo. Efektive, amiko, kiam mi aŭdis, ke mi vi estas gubernatoro, mi pensis, ke mi falos morta de plezuro, ĉar vi jam scias, ke, laŭdire, subita ĝojo tiel mortigas kiel granda doloro. Kaj via filino Sanchica senvole pisis sur sin el pura feliĉo. Mi havis antaŭ mi la kostumon de vi senditan; ĉe la kolo la koralojn de la dukino; en la mano la leterojn, kaj tie staris la mesaĝisto en persono: tamen mi pensis kaj kredis, ke, kion mi vidis kaj tuŝis, tio estas nur revo, ĉar, kiu imagi, ke paŝtisto de kaprinoj fariĝos gubernatoro de insuloj? Vi scias, amiko, ke mia patrino diris, ke por vidi multe oni devas longe. Kaj efektive, mi esperas vidi pli, se mi vivos pli longe, kaj ne ripozos ĝis mi vidos vin luigisto aŭ imposto-kolektisto, ĉar tiaj personoj havas kaj spezas multe da mono, kvankam la diablo prenas kun si la friponojn, kiuj misuzas la menciitajn profesiojn. La sinjorino dukino informos vin pri mia deziro iri al la ĉefurbo. Konsideru la aferon kaj

sciigu al mi, ke vi konsentas: mi klopodus honori vin, irante ĉien en kaleŝo.

La pastro, la barbiro, la bakalaŭro kaj eĉ la sakristiano ne povas kredi vin gubernatoro kaj asertas, ke la tuta afero estas iluzio aŭ ia ensorĉo, kiaj ordinare trafas vian mastron don Quijote. Sansón diras, ke li iros serĉi vin por elbati la gubernatorecon el via kapo, kaj la frenezon el la cerbo de don Quijote. Mi nur ridas, rigardas mian kolieron, kaj pensas pri la vesto, kiun mi faros el via kostumo por Sanchica. Al mia sinjorino la dukino mi sendas nombron da glanoj: mi dezirus ilin oraj. De via flanko, sendu al mi kelke da perlo-koliero, se ili ekzistas en via insulo.

Jen la novaĵoj de la vilaĝo: Berrueca edzinigis sian filinon al fuŝa pentristo, kiu venis ĉi tien proponi sin por ajna pentrolaboro. La administrantaro de la vilaĝo komisiis al li pentri la blazon-ŝildon de lia Majesto super la pordo de la magistrato. Li petis du dukatojn, ricevis ilin anticipe, laboris ok tagojn, sen efektive pentri ion, kaj fine diris, ke ne prosperas al li pentri tiom da stultaj detaloj. Li redonis la ricevitan monon, tamen li edziĝis pro sia famo de bona laboristo; vere li forlasis la penikojn kaj prenis la ŝpaton kaj nun brave laboras en la kampoj. La filo de Pedro Lobo ricevis la ordinojn kaj la tonsuron kaj intencas fariĝi pastro. Minguilla, la nepino de Mingo Silvato, aŭdis pri lia intenco kaj prezentis plendon kontraŭ li pro rompo de edziĝo-promeso, Klaĉemaj langoj diras, ke li gravedigis ŝin, sed li absolute negas tion. Ĉi-jare ne estas olivoj, kaj en la tuta vilaĝo troviĝas eĉ ne unu guto da vinagro. Kompanio de soldatoj preterpasis ĉi lokon kaj tri knabinoj de la vilaĝo foriris kun la trupo. Mi ne diras al vi iliajn nomojn, ĉar eble ili revenos, kaj sendube ne mankos viroj pretaj edziĝi al ili malgraŭ ties pli malpli grandaj makuloj.

Sanchica faras punktojn, per tio perlaboras ok maravedojn ĉiutage, kaj metas ilin ne ŝparmonujon, kiel helpon por la akiro de sia dotaĵo. Sed tial, ke nun ŝi estas filino de gubernatoro, vi donos al ŝi la dotaĵon, kaj ŝi ne bezonos labori tiucele. La fontano de la placo sekiĝis. Unu fulmo trafis la turon de la kirko... sed kio ne doloras, pri tio mi ne ploras.

Mi atendas respondon al ĉi letero kaj vian decidon, ĉu mi iru aŭ ne al la ĉefurbo. Kaj fine, Dio donu al vi pli longan vivon ol al mi, aŭ almenaŭ same longan, ĉar mi ne volus lasi vin sola en la mondo.

Via edzino,

Teresa Panza

Ĉi leteroj provokis multe de laŭdoj, ridoj kaj admiroj, kaj, kvazaŭ por ĉion kroni, alvenis mesaĝisto kun la letero de Sancho al don Quijote. Oni same legis ĝin publike, kaj ĝia enhavo ŝancelis ĉies ideon pri la stulto de la gubernatoro. La dukino retiris sin, por ke la paĝio rakontu al ŝi pri siaj travivaĵoj en la vilaĝo de Sancho. La paĝio raportis longe, sen preterlasi ajnan detalon, transdonis al ŝi la glanojn kaj ankaŭ unu fromaĝon, lastatempe aldonitan de Teresa, kiu estis dirinta al la paĝio, ke ĝi estas bonega, eĉ supera al la fromaĝoj de la vilaĝo Tronchón. La dukino ĉion akceptis kun ega plezuro. Kaj jam ĉi tie ni devas lasi ŝin por rakonti la finon de la granda Sancho, floro kaj spegulo de insulaj gubernatoroj.

Ĉapitro 53

Pri la agitata fino kaj pereco de la gubernatoreco de Sancho Panza

Estus absurde pensi, ke en ĉi vivo la aferoj daŭros senŝanĝe en la sama stato; male, ŝajnas, ke ĉio sekvas sin rondire: la somero la printempon, la aŭtuno la someron, la vintro la aŭtunon kaj la printempo la vintron, kaj tiel la tempo turniĝas ĉirkaŭ si mem kvazaŭ rado senhalta. Nur la homa vivo kuras, pli rapide ol la vento, al sia fino, sed sen espero de renoviĝo, se ne en la transa mondo, kie limoj ne ekzistas. Tion diras Cide Hamete, mahometana filozofo: ĉar multaj homoj, sen ricevi la inspiron de la fido, kaj nur per siaj naturaj lumoj, komprenas la rapidon kaj nestabilon de la nuna ekzisto kaj la eternan daŭron de la alia esperata vivo. Sed ĉi tie, la rimarko de Cide Hamete aludas nur al tio, kiel rapide finiĝis, konsumiĝis, detruigiĝis, turniĝis en ombron kaj fumon la regado de Sancho Panza.

En la sepa nokto de sia gubernatoreco li kuŝis en la lito, sata, ne de pano aŭ vino, sed de tio, juĝi, soni opiniojn, fari leĝojn kaj dekretojn. Kaj kiam, malgraŭ lia granda apetito, la dormemo komencis fermi al li la okulojn, li aŭdis orelŝiran bruadon el sonoriloj kaj krioj, tian, ke ŝajnis, kvazaŭ la tuta insulo enabismiĝus en la maron.

Li sidiĝis en la lito kaj aŭskultis atente, kun la intenco eltrovi la kaŭzon de la bruego, sed vane, ĉar al la pandemonio de krioj kaj sonoriloj miksiĝis senfina nombro da trumpetoj kaj tamburoj. Sancho eĉ pli konfuziĝis kaj, plena de alarmo kaj teruro, saltis el la lito, surmetis paron da pantofloj, pro la humido de la planko, kaj, sen kovri sin per negliĝo aŭ io

simila, apertis la pordon, ĝuste en la momento kiam pli ol dudek personoj, kun lumaj torĉoj kaj elingitaj glavoj, alkuris al li sur la koridoroj, laŭtege kriante:

—Al la armoj, sinjoro gubernatoro, al la armoj! Nekalkuleblaj malamikoj invadis la insulon, kaj ni estos perditaj, se via scio kaj kuraĝo ne helpos nin!

Brue, impete kaj tumulte ili alvenis al la loko, kie Sancho staris plena de stuporo kaj miro antaŭ ĉio, kion li vidis kaj aŭdis. Kaj unu el la bruantoj diris al li:

—Tuj armu vin, se vi ne volas pereji kune kun la insulo.

—Ĉu armi min? —protestis Sancho—. Kiom mi scias pri armoj kaj helpoj? Prefere lasu ĉi aferojn por mia mastro don Quijote. En du palpebrumoj li solvos la situacion. Mi, kompatinda, komprenas nenion pri ĉi hasto.

—Nu, sinjoro gubernatoro! —diris alia—. Kial vi staras neniofare? Armu vin. Ĉi tie ni portas por via moŝto batalilojn por atako kaj defendo. Eliru al la placo kaj estu nia gvidanto kaj kapitano. Tion vi devas fari pro via karaktero de gubernatoro.

—Nu, bone do, armu min —respondis Sancho.

Tuj oni alportis al li paron da antikvaj ŝildegoj (la bruantoj intence provizis sin per ili jam pli frue) kaj, sen lasi lin surmeti ian veston, alpuŝis al li, en ĉemizo, unu ŝildegon antaŭe kaj la alian malantaŭe, eligis liajn brakojn tra du truoj jam faritaj al la ŝildoj, kaj forte ligis lin per ŝnuroj, tiamaniere, ke li vidis sin enpakita, kunpremita, rekta kiel ŝpinilo kaj nekapabla flekseti la genuojn aŭ fari unu solan paŝon. Oni enmanigis al li unu lancon, kaj li devis apogi sin sur ĝi por sin teni sur la piedoj. Post oni diris al li, ke li marŝu

kaj kuraĝige gvidu ilin: ĉar, kun li kiel ilia lumo kaj poluso, ĉio irus bone.

—Kiel mi, kompatinda, povus marŝi? —respondis Sancho—. La ŝildoj tiel enpremas al mi la karnon, ke mi eĉ ne povas movi la artikon de la genuoj. Portu min do en viaj brakoj kaj lasu min en kuŝa aŭ stara pozicio en ia poterno: mi defendos ĝin, aŭ per ĉi lanco, aŭ per mia korpo.

—Nu, marŝu, sinjoro gubernatoro —diris alia—. La timo, pli ol la ŝildoj, paralizas vin. Movu vin, rapidu, ek! Estas tarde, la nombro de la malamikoj kreskas, la krioj pli laŭtas, kaj la danĝero minacas jam de proksime

La kompatinda gubernatoro, tiamaniere urĝata kaj incitata, provis movi sin, sed perdis la ekvilibron, peze falis, kaj tiel forte frapiĝis kontraŭ la plankon, ke li pensis, ke li dispeciĝis. Li kuŝis kiel testudo enfermita kaj kovrita de siaj karapacoj, kiel salita viando porka premata inter du tabuloj por ĝin fumaĵi, aŭ kiel boato renversita sur strando. Kaj kvankam la grupo por de mistifikantoj vidis lin falinta, tamen ĝi ne montris al li kompaton; kontraŭe, ili estingis la torĉojn, plilaŭtigis la kriadon kaj ripetis la alvokon urĝe preni la armojn, tretante super la povra Sancho kaj donante nekalkuleblan nombron da hakoj sur liajn ŝildojn; kaj dank' al tio, ke li kumprenis sin kaj entiris la kapon sub la karapacoj, li ne vidiĝis en pli kompromita situacio. Kunstreĉita do en sia spaceto, li ŝvitis kaj reŝvitis kaj tutkore petis Dion liberigi lin de la danĝero. Kelkaj stumblis kontraŭ lin, aliaj falis sur lin, kaj unu eĉ stariĝis sur lia karapaco iom longan tempon, kaj de tie, kvazaŭ de gvato-turo, li komandis la armeon, kriante:

—Venu la niaj! Ĉi tie la malamikoj enpuŝas sin! Gardu tiun poterton! Tenu fermita la tiean pordon! Faligu ĉi eskalojn!

Alportu grenadojn! Uzu la kaldronojn kun bolaj peĉo, rezino kaj oleo! Barikadu la stratojn per matracoj!

Efektive, li menciis plenvoĉe ĉian armon, rimedon kaj milit-maŝinon uzatan por la defendo de urbo kontraŭ sturmo. La trabatata Sancho aŭskultis kaj suferis ĉion kaj diris en si:

—Ho, Dio volu, ke jam baldaŭ forperdiĝu ĉi insulo, kaj ke mi vidu min, aŭ morta aŭ libera de ĉi angoro!

La ĉielo sendube aŭskultu lian suplikon, ĉar, subite, aŭdiĝis:

—Ni venkis, ni venkis! La malamiko dispeliĝas! Nu, sinjoro gubernatoro, leviĝu kaj venu ĝui la triumfon kaj disdoni la trofeojn konkeritajn de la forto de via nevenkebla brako.

—Levu min —petis kun dolora voĉo la dolorplena Sancho.

Oni helpis lin stariĝi, kaj, jam surpiede, li diris:

—Oni najlu al mi en la frunton la malamikon venkitan de mia brako! Mi volas, ne disdoni trofeojn de malamikoj, sed supliki al ajna amiko, se eĉ unu amikon mi havas, ke li donu al mi unu gluton da vino, ĉar mi mortas de soifo, kaj ke li forviŝu mian ŝviton, ĉar mi solviĝas en akvon.

Oni viŝis lin, alportis al li vinon, deligis de li la ŝildon, kaj, kiam li vidis sin en sia lito, li svenis pro la timo, la ekscitiĝo kaj la laco. La mistifikantoj komencis penti, ke ili faris la ŝercon tro peza, sed kiam la konscio revenis al Sancho, ilia zorgo pro la sveno de la gubernatoro mildiĝis. Li demandis pri la horo, kaj oni respondis al li, ke jam tagiĝas. Sen diri ion plian, muta, en tomba silento, Sancho komencis vesti sin, dum ĉiuj lin rigardis kaj scivole atendis, al kio kondukus lia subita decido leviĝi. Fine, jam vestita, li ekiris per paŝetoj (ĉar lia tuta korpo doloris, kaj li ne povis fari longajn paŝojn) trenis la piedojn ĝis la stalo, sekvate de la tuta grupo,

alvenis al sia azeno, brakumis ĝin, donis al ĝi sur la frunto kison de paco kaj diris kun larmaj okuloj:

—Venu ĉi tien, amiko, kara kompano, kunsuferanto de miaj doloroj kaj mizeroj. Kiam ni iris kune, kaj miaj solaj zorgoj limiĝis al tio, nutri vian korpaĉeton kaj fliki vian harnison, feliĉe pasis miaj horoj, miaj tagoj kaj miaj jaroj; sed, de kiam mi forlasis vin kaj grimpis la turon de la ambicio kaj la orgojlo, mil mizeroj, du mil problemoj kaj kvar mil zorgoj penetris mian animon.

Dum li tiel parolis, li samtempe garnis la azenon per la ŝarĝo-selo, meze de la absoluta silento de la ĉeestantoj. Post ol fine li harnisis la bruton, Sancho, kun afliktita koro, sidiĝis sur ĝi kaj, turnante sin al la majordomo, la sekretario, la butleroj, la doktoro Pedro Recio kaj al multaj aliaj tie troviĝantaj, diris:

—Sinjoroj, lasu min pasi kaj reveni al mia iama libereco. Lasu min iri trovi la pasintan vivon, ke mi povu resurekti el ĉi nuna morto. Mi ne naskiĝis por esti gubernatoro aŭ por defendi insulon aŭ urbon kontraŭ malamikoj, kiam ajn ili volus ataki. Mi scipovas planti kaj pritondi vitojn, plugi kaj fosi pli bone ol dikti leĝojn kaj defendi provincojn kaj regnojn. Sankta Petro bone sidas en Romo; mi volas diri, ke ĉiu okupas sian ĝustan lokon, se li plenumas la metion por kiu li naskiĝis. Pli bone kongruas kun mi serpo enmane ol gubernatora sceptron. Mi preferas ŝtopi min per salato ol esti submetita al la kaprico de impertinenta kuracisto kapabla mortigi min de malsato; kaj mi preferas dormi, en la ombro de kverko en la somero, kaj kovri min per ŝafofela mantelo en la vintro, ol kuŝi inter holandaj litotukoj kaj surmeti zibelaĵon meze de la ŝarĝoj kaj la devoj de la regado. Dio donu sian protekton al viaj moŝtoj! Bonvolu diri al mia sinjoro la duko, ke mi naskiĝis nuda, kaj nuda mi troviĝas ankoraŭ, do neniom perdis aŭ gajnis. Mi volas diri, ke mi

venis regi sen soldo en poŝo, kaj sen soldo en poŝo mi foriras, tute malsane ol kutimas la gubernatoroj de aliaj insuloj. Faru al mi vojon kaj lasu min pasi: mi iras plastri min, ĉar mi kredas, ke ĉiuj miaj ripoj rompiĝis, dank' al la malamikoj, kiuj promenaĉis sur mi ĉi-nokte.

—Ne foriru, sinjoro gubernatoro —diris doktoro Recio—. Mi preskribos al vi pocion kontraŭ la sekvoj de faloj kaj batadoj, kaj ĝi plene redonos al vi vian antaŭan forton kaj energion. Rilate al manĝoj, mi promesas al via moŝto, ke mi ŝanĝos mian sintenon kaj permesos vin manĝi ĉion ajn, abunde kaj laŭ via plaĉo.

—Tro tarde jam por ŝanĝoj —respondis Sancho—. Tiom mi dezirus resti ĉi tie, kiom fariĝi turko. Ĉi mistifikoj ne tolereblas duan fojon. Je Dio, mi flirtus sen flugiloj tra la aero, antaŭ ol plu okupi la gubernatoran postenon aŭ akcepti alian similan, eĉ se oni proponus ĝin al mi en la plej favoraj kondiĉoj. Mi apartenas al la familio Panza, kaj ni ĉiuj estas obstinaj: se foje ni diras jes, eĉ se takte ni devus diri ne, estos jes spite al la tuta mondo. En ĉi stalo restu la flugiloj de la formiko. Ili levis min en la aeron, por ke min manĝu la hirundoj kaj aliaj birdoj. Mi revenu do al mia simpla piedirado sur la tero, ĉar, kvankam mi ne portos luksajn ŝuojn el kordova ledo, tamen ne mankos al mi kanabaj sandaloj. Ĉiu angulo kun sia sanktulo, kaj oni vivu ne kiel oni volas, sed kiel oni povas. Kaj lasu min pasi, ĉar estas tarde.

—Sinjoro gubernatoro, volonte ni lasus vin iri —respondis la majordomo—, kvankam ni tre bedaŭros perdi vin pro via talento kaj via kristana konduto. Sed, kiel sciante, la gubernatoroj havas la devon, antaŭ ol ili forlasas sian oficon, prezenti siajn kontojn. Prezentu do la kontojn rilate al la dek tagoj de via gubernatoreco, kaj poste iru en paco, kaj Dio vin akompanu.

—Nur persono rajtigita de mia sinjoro la duko povus peti de mi kontojn —respondis Sancho—. Tial, ke mi renkontos la dukon, mi prezentos la kontojn al li mem. Krome, mi foriras nuda, do ne necesas alia pruvo, ke mi regis kiel anĝelo.

—Je Dio, la granda Sancho pravas —diris doktoro Recio—. Mi opinias, ke ni devas lasi lin iri, ĉar la duko tre ĝojos revidi lin.

La ceteraj ĉeestantoj opiniis same kaj lasis lin eliri. Sed unue oni proponis al li sian kompanion kaj kion ajn li dezirus por la regalo de sia persono kaj por la komforto de sia vojaĝo. Sancho respondis, ke li deziras nur iom da hordeo por sia azeno kaj duonan panon kaj pecon de fromaĝo por si mem, ĉar la vojo estis tiel kurta, ke ne necesis pli abundaj aŭ pli bonaj provizoj. Ĉiuj brakumis lin, li reciprokis plorante, elrajdis kaj lasis ilin mirigitaj pro siaj vortoj kaj pro sia saĝa kaj firma decido.

Ĉapitro 54

Pri aferoj apartenantaj nur al ĉi historio, ne al alia

La gedukoj decidis antaŭenpuŝi la aferon de la defio, kiun don Quijote ĵetis kontraŭ ilia servutulo pro la motivo jam konata. Sed tial, ke la junulo troviĝis en Flandrujo, kien li forkuris por eviti al si havi doña Rodríguez kiel bopatrinon, la gedukoj decidis anstataŭigi lin per gaskona lakeo nomita Tosilos, detale klariginte al li, kiel li devus konduti. Du tagojn poste la duko informis la hidalgon, ke en kvar tagoj lia kontraŭulo alvenos, prezentiĝos en kavalira armaĵo, kaj asertos, ke la knabino mensogas, je duona, kaj eĉ je tuta barbo,^[387] se ŝi insistas, ke li promesis edziĝi al ŝi. Don Quijote plezure ricevis la novaĵon, flatis sin per la ideo, ke li faros mirindaĵojn en ĉi afero, kaj konsideris sin feliĉa havi la okazon montri la potencon de sia nevenkebla brako antaŭ la duko kaj la dukino. Tiel do, li atendis kun granda ĝojo la pason de la kvar tagoj, kies daŭro, en lia senpacienco, ŝajnis longiĝi ĝis kvar jarcentoj.

Ni lasu la tagojn pasi (same kiel ni lasas pasi aliajn aferojn) kaj iru akompani Sanchon, kiu duone gaja, duone trista, rajdis sur la azeno survoje al sia mastro, kies kompanio plaĉis al li pli ol gubernatori super ĉiuj insuloj de la mondo.

Nu, okazis, ke li ne multe distanciĝis de la loko de sia gubernatoreco (li neniam ĝenis sin ekscii, ĉu li regis insulon, urbon aŭ vilaĝon), kiam li vidis veni sur la vojo ses pilgrimantojn kun ties longaj bastonoj. Temis pri eksterlandanoj, el tiuj, kiuj petas almozon kantante. Jam proksimaj al Sancho, ili dismetis sin en formon de alo, levis la voĉon samtempe kaj komencis kanti en sia lingvo ion,

kion Sancho ne komprenis, se escepti la klare prononcitan vorton «almozo». Li konkludis do, ke ili petas monon per sia kanto, kaj tial, ke —laŭ aserto de Cide Hamete— li estis tre karitata, li elprenis el sia dusako sian provizon de pano kaj fromaĝo kaj ĝin proponis al la grupo, dirante per gestoj, ke li havas nenion alian por doni. Ili tre volonte akceptis la donacon, sed diris:

—Guelte, guelte.[\[388\]](#)

—Mi ne komprenas vin, bonuloj —respondis Sancho.

Tiam unu el ili eltiris burson el sub sia ĉemizo kaj montris ĝin al Sancho, por ke li komprenu, ke ili deziras monon; sed li metis la dikfingron sur sian gorĝon kaj etendis la manon supren por signifi, ke li ne havas eĉ unu solan soldon. Poste li ekiris pasi inter ili, kaj tiam unu pilgrimanto, kiu jam de la komenco rigardadis lin kun granda atento, alkuris al li, ĵetis la brakojn ĉirkaŭ lian talion, kaj diris laŭte kaj en bona kastilia lingvo:

—Je Dio, kion mi vidas? Ĉu mi ne havas en miaj brakoj mian karan amikon kaj najbaron Sancho Panza? Jes, sendube, ĉar ĉi-momente mi nek dormas, nek estas ebria.

Sancho miris, ke oni vokas lin per ties nomo, kaj ke fremda pilgrimanto lin brakumas; kaj kvankam la ŝildisto fikse kaj silente rigardis lin, li ne povis rekoni la fremdulon. Sed la pilgrimanto, vidante lian perpleksan vizaĝon, diris:

—Nu! Ĉu eble, frato Sancho Panza, vi ne konas vian najbaron, la mudeharon Ricote, la merceriston de via vilaĝo?

Tiam Sancho rigardis lin eĉ pli atente, komencis rememori liajn trajtojn, fine plene rekonis lin kaj, sen desalti de sur la azeno, ĵetis la brakojn ĉirkaŭ la kolon de la alia kaj diris:

—Kiu, je la diablo, povus rekoni vin, Ricote, en tiel ekstravaganca kostumo? Diru, kiu faris vin francaĉo, kaj kial vi aŭdacas reveni al Hispanio, kie, se oni vin kaptus kaj konus, via sorto ne estus enviinda?

—Se vi ne denuncos min —respondis la pilgrimanto—, neniu konos min en ĉi kostumo. Sed ni deviu de la vojo kaj iru al la poplaro tie videbla, kie miaj kompanoj deziras manĝi kaj ripozi. Vi manĝos kun ili, ĉar ili estas tre agrablaj, kaj mi havos la ŝancon rakonti al vi ĉion al mi okazintan, de kiam mi forlasis nian vilaĝon, obeante la reĝan dekretan, kiu, kiel vi scias, minacis per severaj punoj mian kompatindan popolon.

Sancho akceptis la inviton, Ricote diris ion al siaj kompanoj, kaj la grupo iris al la poplaro staranta je kelka distanco de la vojo. Alveninte, ili ĵetis flanken la bastonojn, demetis la pelerinojn kaj restis en siaj saĵoj. Ĉiuj estis junaj kaj bel-aspektaj, krom la jam matur-aĝa Ricote, kaj portis kun si dusakojn ŝajne bone provizitajn per, almenaŭ, manĝaĵoj apetitigaj kaj trink-invitaĵoj eĉ de la distanco de unu mejlo. Ili kuŝiĝis sur la grundo kaj, uzante la herbon kiel tablo-tukon, dismetis sur ĝi panon, salon, tranĉilojn, nuksojn, pecojn de fromaĝo, kelke da nudaj ŝink-ostoj ne jam ronĝeblaj, sed almenaŭ suĉeblaj, kaj laste ian nigran pladon nomitan kaviaro, kiu fariĝas el fiŝ-ovoj kaj estas forte soifo-dona. Olivoj ne mankis, bongustaj kaj palato-flataj, kvankam ili vidiĝis sekaj kaj ne kondimentitaj. Sed kiel ĉampionoj en ĉi festeno-kampo eminentis ses botoj da vino. Ĉiu elprenis la sian el sia dusako, kaj eĉ la bona Ricote, turniĝinta de mudeharo en germanon, montris la sian, laŭdimensie kompareblan kun la aliaj kvin.

Ili komencis manĝi kun ega apetito, prenis per la pinto de la tranĉiloj iometon de ĉiu plado, tre lante ĝin gustumis, kaj proksimigis la buŝon de la botoj al siaj propraj buŝoj,

fiksante la okulojn al la ĉielo, kvazaŭ ili alcelus tien per la rigardo. Ili teniĝis tiamaniere kelkan tempon, movante la kapon de flanko al flanko, kiel montron de granda plezuro, dum la internaĵo de la botoj kaskadis en iliajn stomakojn.

Ĉion rigardis Sancho, kaj nenio lin afliktis: kontraŭe, por fideli al la proverbo de li tre konata: «Kiam en Romo, faru kiel la Romanoj», li petis de Ricote ties boton kaj celis per ĝi sian buŝon, kun ne malpli da plezuro ol la ceteraj. La botoj lasis sin levi kvar fojojn, sed ne la kvinan, ĉar ili estis jam sen unu guto da vino, ne plu melkeblaj, kaj ŝrumpintaj kiel seka figo, kio dampis la ĝojon de la grupo. De tempo al tempo, unu el la pilgrimantoj prenis la manon de Sancho kaj diris:

—Espagnoli kaj tudesqui tuto uno bon compagno.^[389]

Kaj Sancho respondis:

—Bon compagno, jura Di!^[390]

Kaj li ridegis unu horon, sen memori tiam siajn gubernatorajn travivaĵojn: ĉar, ordinare, la zorgoj ne havas jurisdikcion super la tempo dediĉata al manĝo kaj trinko.

Nu, ĉe la elĉerpiĝo de la vino, la viroj komencis senti grandan torporon kaj fine profunde endormiĝis sur tabloj kaj tukoj, t.e. sur la herbo mem. Nur Ricote kaj Sancho restis vekitaj, ĉar ili manĝis pli, kaj drinkis malpli ol la aliaj. Ricote prenis Sanchon je la mano, apartiĝis kun li de la pilgrimantoj, mergitaj en dolĉa dormo, kaj en pura kastilia lingvo, sen refali eĉ unu solan fojon en sian mudeharan ĵargonon, li diris:

—Vi bone scias, amiko kaj najbaro Sancho, ke la edikto proklamita de lia reĝa moŝto kontraŭ mia popolo vekis en ni alarmon kaj teruron. Mi tiel forte timiĝis, ke mi imagis, ke oni

jam aplikas al mi kaj al mia familio la rigoran punon preskribitan de la edikto, eĉ antaŭ ol finiĝus la tempo, kiun ni leĝe disponis por forlasi Hispanion. Mi pensis, ke, se mi nepre devus forlasi mian domon kaj sekve havigi al mi alian, estus prudente foriri sola de la vilaĝo kaj serĉi lokon, kie mi povus enloĝigi la familion trankvile kaj sen la hasta sinpelo de la aliaj: ĉar mi bone komprenis, kaj ankaŭ niaj olduloj, ke la proklamo estis, ne nura minaco, kiel kelkaj opiniis, sed ordono efektivigenda en difinita tempo. Mi havis tian konvinkon, ĉar mi sciis pri la absurdaj kaj perfidaj intencoj de mia popolo, kaj certe la ĉielo inspiris lian reĝan moŝton alpreni tiel saĝan decidon. Cetere, ni ĉiuj ne kulpis: kelkaj el ni estis veraj kaj bonaj kristanoj, sed tiel malmultaj, ke ili ne povis oponi al la intrigoj de la aliaj: kaj ne konvenas flegi vipuron en sia sino, kiam oni havas la malamikon en sia hejmo. Fakte oni prave nin kondamnis al ekzilo, milda kaj leĝera puno laŭ ies opinioj, sed la plej terura, kiun ni povus suferi. Kie ajn ni troviĝas, ni plore sopiras al Hispanio, ĉar finfine ni naskiĝis ĉi tie, kaj ĝi estas nia vera lando. Sed nenie ni renkontis la akcepton deziratan de nia misfortuno. En Berberio kaj en aliaj partoj de Afriko ni esperis, ke oni bonvenigus kaj regalus nin, sed ĝuste tie ni ricevas plej terurajn ofendojn kaj mistraktojn. Ni ne konsciis pri nia feliĉo, ĝis ni ĝin perdis, kaj la pliparto el ni tiel ege deziras revidi Hispanion, ke multegaj, kiuj scipovas la hispanan, kiel mi, revenas lasinte en la eksterlando la edzinon kaj filojn neprotektataj: ĝis tia ekstremo ni amas Hispanion; kaj nun mi scias, laŭ propra sperto, ke, kiel oni diras, «dolĉas la amo al la patrujo». Nu, bone, mi forvojaĝis de nia vilaĝo kaj iris al Francio, kie oni bone akceptis nin. Sed mi deziris vidi la aliajn landojn, do vizitis Italion kaj alvenis al Germanio, kie, ŝajnis al mi, mi povus vivi pli libere, ĉar ties loĝantoj ne zorgas pri subtilaĵoj. La homoj kondukas tie laŭplaĉe, tial, ke preskaŭ en la tuta lando oni vivas en religia libereco. Mi luprenis domon en vilaĝo proksima al Aŭgsburgo, kaj kuniĝis kun ĉi viroj. Multaj pilgrimantoj germanaj kutimas veni

ĉiujare al Hispanio, por viziti ties sanktajn lokojn, kaj ilin konsideras veraj Eldoradoj, ĉar ĉie ili scias havigi al si ion avantaĝan aŭ profitan. Ili vagas tra preskaŭ la tuta Hispanio, kaj ne ekzistas vilaĝo, kie ili ne ricevas senpage manĝon kaj trinkon kaj, krome, almenaŭ unu realon en kontanta mono. Ĝis la fino de sia pilgrimado ili sukcesas ŝpari pli ol cent eskudojn, ŝanĝas ilin per oraj moneroj, kaŝas ilin ie ajn, en la kavoj de la bastonoj aŭ inter la flikoj de la pelerino, kaj kontrabandas la monon el la regno, malgraŭ la gardistoj de postenoj kaj havenoj, kie oni priserĉas ilin. Mi intencas nun, Sancho, repreni la trezoron, kiun mi lasis enterigita, kaj tial, ke ĝi kuŝas ekster la vilaĝo, mi povos elfosi ĝin sen danĝero. Poste, de Valencio mi skribos, aŭ mem iros, al miaj edzino kaj filino. Mi scias, ke ili troviĝas en Alĝerio, kaj de tie mi klopodos preni ilin al franca haveno kaj tuj sekve al Germanio, kie ni atendos kion la dia volo rezervos al ni. Verdire, Sancho, mi scias, ke mia filino Ricota kaj mia edzino Francisca Ricota estas kristanaj kaj katolikaj; kaj, kvankam mi mem ne havas tiel fortan katolikan fidon kiel ili, tamen mi sentas min pli kristana ol maŭra, kaj ĉiam suplikas Dion, ke li apertu al mi la okulojn de la spirito kaj konigu al mi, kiel mi devas servi Lin. Sed kio surprizas min, kaj ŝajnas al mi nekomprenebla, estas, ke miaj edzino kaj filino preferis vojaĝi, ne al Francio, kie ili povus vi vi kiel kristanoj, sed al Alĝerio.

—Nu, Ricote, certe ili ne povis decidi per si mem, ĉar ilin prenis tien Juan Tiopieyo, la frato de via edzino —respondis Sancho—. Kaj tial, ke li estas vera maŭro, li vojaĝis al la plej konvena loko por si. Kaj jen alia afero: mi opinias, ke vi vane serĉos kion vi enterigis, ĉar mi aŭdis la novaĵon, ke oni konfiskis al viaj bofrato kaj edzino grandan nombron da perloj kaj oraj moneroj, kiujn ili portis kun si.

—Povas esti —diris Ricote—. Sed mi scias, Sancho, ke ili ne tuŝis mian trezoron, tial, ke, pro timo al eventuala misfaro,

mi ne rivelis al ili ĝian ekziston. Tiel do, se vi, Sancho, deziras veni kun mi por helpi elfosi kaj kaŝi ĝin aliloke, mi donos al vi ducent eskudojn kaj per ili vi povos kontentigi viajn bezonojn, ĉar vi scias, ke mi scias, ke vi havas multajn.

—Volonte mi helpus vin —respondis Sancho—. Sed okazas, ke mi ne estas mon-avida, kion pruvas la fakto, ke ĉi-matene mi ekŝiĝis el posteno, kie mi povus akiri monon sufiĉan por tegi per oro la murojn de mia domo kaj por manĝi el arĝentaj pladoj antaŭ ol pasus ses monatoj. Pro tio, kaj ankaŭ tial, ke mi pensas, ke mi perfidus mian reĝon, se mi helpus liajn malamikojn, mi ne akompanus vin, eĉ se, anstataŭ la ducent eskudoj promesitaj, vi donus al mi ĉi-momente kvarcent.

—Kian postenon vi lasis, Sancho? —demandis Ricote.

—La gubernatorecon de insulo —respondis Sancho—. Tian, ke ne facile oni trovas alian saman.

—Kie kuŝas la insulo?

—Kie? Ses mejlojn for de ĉi tie, kaj nomiĝas insulo Barataria.

—Kion vi diras? La insuloj situas en la maro, ne surtere — respondis Ricote.

—Ĉu vere? Mi ripetas al vi, amiko Ricote, ke ĉi-matene mi ekiris de tie, kaj ke hieraŭ mi ankoraŭ regis ĝin laŭplaĉe kaj bele. Tamen mi forlasis la postenon, ĉar la gubernatora ofico ŝajnas al mi danĝera.

—Kaj kion vi gajnis per via gubernatoreco? —demandis Ricote.

—Mi gajnis la scion —respondis Sancho—, ke mi naskiĝis por regadi nenion, se escepti gregon da ŝafoj, kaj ke la riĉon akireblan en tiaj postenoj oni gajnas je la kosto de la ripozo,

la dormo kaj eĉ la manĝo: ĉar en la insuloj, la gubernatoroj devas apenaŭ manĝi, precipe se ia kuracisto zorgas pli ilia bonfarto.

—Mi ne komprenas vin, Sancho —diris Ricote—. Ŝajnas al mi, ke viaj vortoj ne havas sencon. Kiu donus al vi insulon, ke vi ĝin regu? Ĉu ne ekzistas en la mondo viroj pli lertaj ol vi por gubernatori? Nu, Sancho, vekiĝu el viaj fantazioj, kaj diru, ĉu fine vi volas akompani min, kiel mi vin petis, kaj helpi min elfosi la kaŝitan trezoron. Vera trezoro ĝi estas, pro sia valoro, kaj mi donus al vi sufiĉe por ke vi vivtenu vin, kiel dirite.

—Mi jam diris al vi, ke ne —respondis Sancho—. Estu kontenta, ke mi ne denuncos vin. Iru kun Dio sur via vojo, kaj lasu, ke mi sekvu la mian. Ĉar mi scias, ke oni perdas kion oni honeste akiras, kaj ke, kion oni fripone gajnas, tio perdiĝas kun sia mastro.

-Sancho, mi ne volas insisti —diris Ricote—. Sed, diru, ĉu vi estis en nia vilaĝo, kiam ekiris de tie miaj edzino, filino kaj bofrato?

—Jes, mi estis —respondis Sancho—, kaj sciu, ke via filino aperis tiel bela, ke ĉiuj vilaĝanoj ne ĉesis admiri ŝin, dirante, ke ŝi estas la plej bela knabino de la mondo. Ŝi ploris kaj brakumis al siaj amikinoj kaj konatinoj, kaj ankaŭ al la ceteraj personoj irintaj ŝin adiaŭi, kaj ŝi petis ilin rekomendi ŝin al Dio kaj al Nia Sinjorino. Kaj ŝi faris sian peton tiel kortuŝe, ke mi ploris, kvankam mi ne ploremas. Fakte, multaj personoj deziris eliri kapti ŝin sur la vojo por ŝin kaŝi, sed la timo kontraŭi la ordonon de la reĝo detenis ilin. Plej decida montriĝis don Pedro Gregorio, la juna kaj riĉa heredonto, kiun vi konas. Laŭdire, li tre amis ŝin, kaj, post ol ŝi forvojaĝis, li neniam plu vidiĝis en nia vilaĝo, kaj ni ĉiuj

pensis, ke li iris post ŝi kun la intenco forkapti ŝin. Sed ĝis nun oni scias nenion novan pri la afero.

—Ĉiam mi suspektis, ke tiu kavaliro amindumis mian filinon. Sed mi fidis je la virto de mia Ricota kaj ne zorgis, ke li sentis amon al ŝi. Certe vi scias, Sancho, ke la maŭrinoj neniam, aŭ preskaŭ neniam, havas am-intrigon kun la oldkristanoj: kaj mia filino, kiun mi opinias pli kristana ol am-inklina, certe ne tre atentis la galantadon de la junulo.

—Dio volu vin prava —respondis Sancho—, ĉar, alie, estus bone nek al via filino, nek al la junulo. Kaj jam ni diru adiaŭ ĉi tie, amiko Ricote: mi deziras alveni ĉi-nokte al la loko, kie vivas mia sinjoro don Quijote.

—Dio akompanu vin, frato Sancho. Miaj kompanoj jam komencas movetiĝi, kaj estas tempo daŭrigi la vojaĝon.

Poste ili brakumis unu la alian, Sancho surazeniĝis, Ricote enmanigis sian bastonon, kaj ili disiris.

[387] La barbo estis simbolo de respektindeco kaj honoro, kaj je ĝi kelkfoje ĵuris la viroj. Ke la knabino ĵure mensogas je barbo estas humura elpenso de Cervantes.

[388] En fuŝa germana: «mono, mono».

[389] En fuŝa itala: «hispanoj kaj germanoj estas inter si bonaj kompanoj».

[390] Sancho pretendas imiti la italan: «Efektive, bonaj kompanoj, mi ĵuras je Dio!».

Ĉapitro 55

Pri tio okazinta survoje al Sancho Panza kaj pri aliaj eventoj eksterordinaraj

Pro sia renkonto kun Ricote, Sancho tre malfruiĝis kaj ne povis alveni en la sama tago al la kastelo de la duko. Mankis al li nur du mejloj de pluiro, kiam la nokto, densa kaj nigra, surprizis lin; sed li ne zorgis, ĉar estis somero. Li do apartiĝis de la vojo kun la intenco ie atendi kuŝe-ripoze la matenon. Kaj ĝuste kiam li serĉis lokon, kie li povus aranĝi sin kiel eble plej komforte li kaj lia azeno falis en profundan kaj nigran abismon, kiu troviĝis inter kelkaj domoj tre oldaj. Falante, li tutkore rekomendis sin al Dio, ĉar li pensis, ke li ruliĝos ĝis la fundo de la infero. Tamen ne okazis tiel, pro tio, ke proksimume dek ok futojn sube, la azeno frapiĝis kontraŭ la fundon, kaj li vidis sin ankoraŭ sur la bruto, sen suferi ian lezon aŭ vundon. La ŝildisto palpis al si la tutan korpon kaj retenis la spiron kun la intenco konstati, ĉu li estas sendifekta aŭ havas truon ie en siaj diversaj partoj. Kaj vidante sin senvunda, sana kaj kompleta, li ne ĉesis danki Dion, tial, ke li faris al li tiel grandan favoron: ĉar li pensis, ke li rompiĝis en mil pecojn. Li palpis ankaŭ la muron de la abismo, por vidi ĉu li povus eliri sen ies helpo, sed li trovis la muron glata, sen anfraktoj taŭgaj por alkroĉiĝo. Tio tre afliktis Sanchon, ĉefe kiam la azeno komencis kortuŝe kaj dolore plendi. Kaj Sancho afliktiĝis, certe ne sen motivo aŭ pro nenio, ĉar vere li troviĝis en mava situacio.

—Ho! —kriis la ŝildisto—. Kiaj neatenditaj akcidentoj ordinare prezentiĝas ĉiupaŝe al la vivantoj en ĉi mizera mondo! Kiu povus imagi, ke homo hieraŭ sidanta en la trono de insulo kaj ordonanta al siaj servistoj kaj subuloj, hodiaŭ

troviĝus sepultita en abismo, sen ke iu savus lin, aŭ sen ke servisto aŭ subulo venus lin helpi? Mi kaj mia azeno pereos de malsato ĉi tie, se antaŭe mi ne mortos pro aflikto, kaj la azeno pro siaj kontuzoj kaj siaj rompitaĵoj. Se almenaŭ mi estus tiel bonŝanca kiel mia sinjoro don Quijote, kiam li descendis en la kavernon de la ensorĉita Montesinos! Tie li ĝuis pli bonan regalon ol en sia propra hejmo, ĉar ŝajne li trovis la tablon primetita kaj la liton preta. Tie li vidis belajn kaj agrablajn viziojn, sed mi vidos ĉi tie, plej eble, nur bufojn kaj kolubrojn. Ve al mi, kian bedaŭrindan finon havas miaj frenezaĵoj kaj fantazioj! Kiam la ĉielo disponos, oni retrovos min kaj elprenos miajn ostojn jam nudaj, blankaj kaj ronĝitaj, kune kun la ostoj de mia bona azeno, kaj eble dank' al ili, la homoj nin rekonos, almenaŭ la homoj sciantaj, ke Sancho Panza neniam apartiĝis de sia azeno, nek lia azeno de Sancho. Denove mi diras: ve al mi!, ĉar mia nigra sorto ne volas, ke mi mortu en mia lando kaj meze de mia gento, kie almenaŭ ne mankus homoj por pliplori min kaj por fermi al mi la okulojn en la lasta momento de mia vivo. Ho, mia kompano kaj amiko! Kiel mave mi rekompencis viajn bonajn servojn! Pardonu min kaj, kiom vi povas kaj scias, petu la Fortunon eltiri nin el ĉi mizera situacio, kie ni ambaŭ troviĝas. Mi promesas meti laŭrkronon sur vian kapon, tiel, ke vi ŝajnos laŭrkronita poeto, kaj duobligi vian porcion da furaĝo.

Sancho lamentadis ĉi-maniere, kaj lia azeno aŭskultis lin sen respondi eĉ unu vorton: tiom grandis lia aflikto kaj angoro. Fine, post ol ili pasigis la tutan nokton en ĉi kortuŝaj plendoj kaj lamentoj, venis la tago, ĉe kies lumo Sancho vidis ke, nehelpe, ili tute ne povos elgrimpi el la puto. Li komencis vei kaj laŭte krii, esperante, ke iu aŭdos lin. Sed liaj krioj perdiĝis en la dezerto, ĉar tie ĉirkaŭe eĉ ne unu persono pasis. Tiam li konsideris sin morta. La azeno kuŝis sur sia dorso, sed Sancho sukcesis starigi ĝin, kvankam ĝi apenaŭ kapablis teni sin sur la piedoj. El la dusako, akompaninta lin

en ties missorta falo, li prenis pecon da pano, donis ĝin al sia azeno, la besto manĝis ĝin tre volonte, kaj Sancho diris, kvazaŭ la azeno lin komprenus: «Se pano ne mankas, la zorgoj ne akras».

Ĉe tio Sancho vidis en unu flanko de la puto aperturon, tra kiu oni eble povus pasi, se oni kaŭrus kaj kuntiriĝus. Sancho enŝovis sin duonrampe kaj rimarkis interne kavon pli grandan kaj spacan. Kaj li povis tion rimarki, ĉar tra la supra parto filtriĝis suna radio. Li vidis ankaŭ, ke la kavo longiĝas kaj volbiĝas en la fundo, tiam revenis al la loko, kie staris la azeno, kaj per unu ŝtono komencis disbati kaj faligi la teron ĉirkaŭ la aperturo, kun la intenco fari pasejon por la azeno. Li baldaŭ efektivigis la laboron, prenis la bridon de la besto kaj antaŭenpaŝis en la groton por vidi, ĉu en alia flanko ekzistas ia eblo eliri. Li paŝis jen en tenebro, jen en mallumo, sed neniam sen timo.

—La ĉiopova Dio min helpu —li diris en si—. Ĉi vera misfortuno devus okazi al mia mastro don Quijote, ĉar li konsiderus ĝin aventuro, pensus, ke ĉi profundaĵoj kaj ublietoj estas palacoj kaj florantaj ĝardenoj, kaj ke el ĉi tenebra kaj prema loko, li elirus en herbejon plenan de floroj. Sed mi, kompatinda homo manka de klarvido kaj de kuraĝo, ĉiumomente imagas, ke, neatendite, alia abismo pli profunda ol la unua apertiĝos ĉe miaj piedoj kaj min definitive glutos. Bonvenon al vi, malbono, se vi alvenas sola!

Tiel li pensis kaj pluiris, kaj kiam ŝajnis al li, ke li jam avancis preskaŭ du mejlojn, li rimarkis iometon da konfuza lumo, ŝajne taga, tra ie penetranta, kaj tiam li imagis, ke, fine, li sukcesos renkonti la vojon al la vivo.

Cide Hamete Benegeli lasas lin ĉi tie kaj revenas al don Quijote, kiu, ĝoje kaj senpacience, atendis la tagon de la

duelo por batali kontraŭ la perfidinto de la filino de doña Rodríguez kaj por ripari la malicaĵon kaj la ofendon faritan al la knabino.

Nu, okazis, ke iun matenon don Quijote elrajdis ekzerci sin kaj praktiki, kun la intenco esti bone preparita por la duelo de la sekvanta tago. Kaj, kiam li instigis la ĉevalon en kurtan kaj subitan galopon, Rocinante tiom proksimiĝis al fendo, ke se la hidalgo ne bridus abrupte la beston, li nepre falus en profundaĵon. Li povis ĝustatempe halti kaj eviti la enfalon kaj, sen desalti de la ĉevalo, rigardis en la fendon. Tiam li aŭdis voĉon el la interno, atente aŭskultis kaj povis distingi kaj kompreni kion la krianto diris:

—Hej, tie supre! Ĉu ne aŭdas min ia kristano, aŭ ia karitata kavaliro kapabla senti kompaton al povra pekulo enterigita viva, al missorta kaj embarasata gubernatoro?

Ŝajnis al don Quijote, ke li aŭdas la voĉon de Sancho. Tio konfuzis kaj perpleksigis lin, kaj, kriante kiom li povis, li diris:

—Kiu estas tie en la fundo? Kiu plendas?

—Kiu povus esti do, kaj kiu povus plendi, se ne la mizera Sancho Panza, gubernatoro, pro siaj pekoj kaj pro sia misfortuno, de la insulo Barataria, kaj iam ŝildisto de la fama kavaliro don Quijote de La Mancha?

Tion aŭdante, don Quijote duoble miris kaj stuporis, kaj venis al li en la kapon, ke Sancho Panza mortis, kaj ke li troviĝas tie submetata al la punoj de la purgatorio. Kaj puŝate de ĉi ideo, li diris:

—Mi petas vin, je la nomo de ĉio sankta al kristana katoliko, ke vi diru, kiu vi estas. Kaj se vi estas punata animo, diru kion mi faru por vi; ĉar tial, ke laŭprofesie mi helpas kaj

favoras la senfortunajn kaj mizerajn de ĉi mondo, sendube mi same devas konduti rilate al la helpindaj de la transa mondo, nekapablaj mem helpi sin.

—Laŭ tio —diris Sancho— vi, la parolanto tie supre, estas mia sinjoro don Quijote de La Mancha. La voĉo estas lia, sendube.

—Jes, mi estas don Quijote —respondis la hidalgo—, kies profesio konsistas en tio, doni helpon kaj protekton al la vivaj kaj al la mortaj en iliaj bezonoj. Tial diru do, kiu vi estas, ĉar vi kaŭzas al mi profundan konsternon. Se vi estas mia ŝildisto Sancho Panza, kaj vi mortis, kaj la diabloj ne portis vin kun si, kaj vi troviĝas en la purgatorio pro la mizerikordo de Dio, nia Sankta Patrino la Eklezio povas, per siaj ritoj, liberigi vin el viaj turmentoj. Kaj de mia flanko, mi propetos kun la Eklezio por via saviĝo, eĉ se tiu-cele mi elspezos ĝis mia lasta soldo. Bonvolu do paroli pli klare, kaj diri, kiu vi estas.

—Mi ĵuras je ĉio ajn —respondis la subtera voĉo— kaj je ajna persono, laŭ la deziro de via moŝto, sinjoro don Quijote de La Mancha, ke mi estas via ŝildisto Sancho Panza, ke neniam mi mortis ankoraŭ, kaj ke, post ol mi forlasis mian gubernatorecon pro kaŭzoj kaj motivoj, por kies klarigo mi bezonus tro longan tempon, mi falis hieraŭ nokte en ĉi abismon kun la azeno. Kaj ĝi pruvos, ke mi ne mensogas, ĉar ĝi staras ĉi tie, ĉe mia flanko.

Nu, ĝuste tiam, kvazaŭ la azeno komprenus kion Sancho diris, ĝi komencis iai tiel forte, ke la tuta kaverno resonis.

—Nerefutebla atestanto, vere! —diris don Quijote—. Mi konas ĝian iaon, kvazaŭ mi mem elpuŝus ĝin. Kaj ankaŭ vian voĉon mi rekonas, kara Sancho. Atendu, mi iros al la kastelo,

kiu estas proksime, kaj revenos kun kelkaj personoj, ke oni eltiru vin el ĉi profundaĵo, kien certe viaj pekoj vin puŝis.

—Bonvolu iri kaj reveni rapide, sinjoro, je Dio —respondis Sancho—. Mi ne povas suferi resti ĉi tie enterigita viva. Kaj mi mortas de timo.

Don Quijote lasis lin kaj iris al la kastelo rakonti al la gedukoj la akcidenton de Sancho Panza. Ili tre miris, kvankam ili bone komprenis, ke li falis en ian truon komunikiĝantan kun subtera galerio konstruita en epoko ne plu memorebla; sed ili ne povis imagi, kial oni ne informis ilin pri lia reveno, kiam li rezignis la gubernatorecon. Fine oni alportis ŝnurojn kaj kablojn, kaj dank' al longa penado de multaj brakoj, oni suprentiris la azenon kaj la ŝildiston de la tenebro en la lumon. Unu studento tie troviĝanta komentis:

—La friponaj devus eliri el siaj postenoj ĉi-maniere, ĝuste kiel ĉi pekanto eliras el la fundo de la abismo: mortanta de malsato, kun senkolora vizaĝo kaj probable sen unu soldo.

Sancho lin aŭdis kaj replikis:

—Antaŭ ok aŭ dek tagoj, frato klaĉema, mi komencis regi la insulon, kiun oni cedis al mi, kaj en la dirita tempo eĉ ne unu horon mi vidis min sata de pano: kuracistoj persekutis min, malamikoj surtretis al mi la ripojn, kaj mi eĉ ne havis la okazon esti subaĉetita aŭ fari fraŭdon. Tiel do, ŝajnas al mi, ke mi ne meritas eliri ĉi-maniere. Sed la homo proponas kaj Dio disponas, kaj Li scias, kio pli taŭgas kaj konvenas al ĉiu. Oni devas akomodiĝi al ĉia cirkonstanco: kaj oni ne diru: «El ĉi akvo mi ne trinkos» ĉar, kie oni esperas trovi ŝinkon, eĉ ties hoko mankas. Kaj Dio min komprenas, kaj punkto. Nenion pli mi diras, kvankam mi povus daŭrigi.

—Ne ĉagreniĝu, Sancho, nek faru al vi tro da zorgoj pro la opinioj de la homoj, se vi volas vivi en paco —diris don

Quijote—. Se vi havas la konsciencan puran, lasu, ke la aliaj parolu laŭplaĉe. Voli silentigi la langon de la klaĉuloj egalus al tio, provi senakvigi la maron. Se gubernatoro foriras riĉa el sia posteno, oni nomas lin ŝtelisto; kaj se senmona, oni diras ke li estas nekapabla kaj stulta.

—Sendube oni opinios min pli stulta ol ŝtelema —respondis Sancho.

Tiel parolante, kaj ĉirkaŭate de buboj kaj de multaj aliaj personoj, ili alvenis al la kastelo, kie, en koridoro, jam la gedukoj ilin atendis. Sed antaŭ ol supreniri renkonti la dukon, Sancho kondukis la azenon en la stalon, dirante, ke la bruto pasigis tre mavan nokton. Poste li prezentiĝis antaŭ siaj gesinjoroj, genuiĝis kaj diris:

—Ĉar tion volis Viaj Grandecoj, mi, kvankam sen propraj meritoj, gubernatoris en via insulo Barataria, kien mi eniris nuda, kaj de kie mi venas same nuda, do mi nek gajnis, nek perdis. Atestantoj de mia konduto povos diri, ĉu mi regis bone aŭ mave. Mi klarigis dubojn kaj juĝis procesojn, mortante dume de malsato, ĉar tion volis doktoro Pedro Recio, naskiĝinta en Tirteafuera kaj kuracisto de insulaj gubernatoroj. Malamikoj atakis nin en la nokto, kaj, kvankam ili metis nin en grandan embarason, la insulanoj asertas, ke ni venkis dank' al la forto de mia brako. Dio donu al ili tiom da sano, kiom da vero ili diras. Unuvorte, mi havis tempon suferi la ŝarĝojn kaj zorgojn proprajn al la regado, kaj konkludis, ke ili estas troa pezo por miaj ŝultroj, kaj netaŭga provizo por mia dusako. Tiel do, antaŭ ol la gubernatoreco sendus min promeni, mi sendis la gubernatorecon al la diablo, kaj hieraŭ matene, mi forlasis la insulon tia, kia mi ĝin trovis: kun la samaj stratoj, domoj kaj tegmentoj. Neniom mi prunteprenis, nek miksis min en profitajn finegocojn. Kaj, kvankam mi intencis dikti kelke da utilaj leĝoj, mi tion ne faris, ĉar mi timis, ke oni ne respektus ilin: kaj en tia kazo,

estas tute same fari aŭ ne fari leĝon. Kiel dirite, mi eliris el la insulo, kaj nur mia azeno akompanis min. Mi falis en abismon, trenis min antaŭen sub la tero ĝis mi vidis ĉimatenes la lumon de la suno kaj eblan eliron. Sed la afero ne prezentiĝis facila, kaj se la ĉielo ne estus sendinta al mi mian sinjoron don Quijote, mi restus tie sube ĝis la fino de la mondo. Tiel do, miaj gesinjoroj duko kaj dukino, jen via gubernatoro Sancho Panza: en nur dek tagoj mi lernis, ke por esti gubernatoro, ne ĝuste de unu insulo, sed eĉ de la tuta mondo, mi ne pagus eĉ unu soldon. Sekve do, mi kisas la piedojn al viaj moŝtoj, kaj imitante la ludon de la knaboj, kiam ili diras «saltu kaj ĝin donu», mi saltas el la gubernatoreco kaj transiras servi mian sinjoron don Quijote. En lia servo mi ne manĝas ĝissate. Kaj kiam mi estas sata, mi tute ne zorgas, ĉu mi ŝtopis min per karotoj aŭ per perdrikoj.

Per tio Sancho metis finon al sia longa parolado, dum kies daŭro, don Quijote konstante timis, ke lia ŝildisto dirus mil absurdojn; kaj vidante, ke li diris tre malmultajn, li dankis en si la ĉielon. La duko brakumis Sanchon kaj diris, ke li profunde bedaŭras, ke li tiel baldaŭ rezignis la gubernatoran postenon, sed ke li havigus al li en sia administracio alian oficon malpli pezan kaj pli profitan. Ankaŭ la dukino brakumis lin, kaj ordonis, ke oni lin bone regalu, ĉar li ŝajnis tute tradraŝita kaj en tre mava stato.

Ĉapitro 56

Pri la grandioza kaj senegala duelo okazinta inter la lakeo Tosilos kaj don Quijote de La Mancha, probatalanto de la filino de la duenjo Rodríguez

La gedukoj ne bedaŭris la mistifikon, kiun ili faris al Sancho, donante al li la gubernatorecon, des malpli, ĉar tiun saman tagon venis ilia majordomo kaj rakontis al ili punkton post punkto preskaŭ ĉion, kion Sancho diris kaj faris dum sia regado; fine li speciale priskribis la sturmon kontraŭ la insulon, la timon de Sancho kaj ties foriro, kaj ĉio ĉi kaŭzis al la gedukoj ne etan plezuron.

Poste, nia historio rakontas, ke la tago de la duelo alvenis. La duko jam ofte instrukciis al sia lakeo Tosilos, kiel li devos kondukti por venki la hidalgon sen mortigi aŭ vundi lin, kaj fine ordonis formeti de la lancoj ties ŝtalajn pintojn, dirante al don Quijote, ke liaj kristanaj sentoj, karaj al li, ne permesas, ke la duelo metu en riskon kaj danĝeron la vivon de la batalantoj; ke la hidalgo devus kontentiĝi je tio, ke li disponigas duelkampon en si lando, kvankam per sia decido li atencas kontraŭ la dekreto de la sankta Koncilio,^[391] kiu prohibas la efektivigon de la dueloj, kaj ke, sekve, li ne deziras puŝi ĝis la ekstremo aferon tiel seriozan.

Don Quijote respondis, ke lia moŝto disponu tute laŭ sia bontrovo, ĉar li akceptas senrezerve liajn decidojn.

Nu, en la fatala tago (la duko jam antaŭe konstruigis, fronte al la placo de la kastelo, grandan trabaĵon por la arbitraciantoj de la duelo kaj por la plendantinoj, t.e. doña Rodríguez kaj ties filino) nekalkulebla nombro da personoj

venis de la ĉirkaŭaj vilaĝoj por ĉeesti tiel raran spektaklon; ĉar, efektive, en tiu lando, nek la vivaj, nek la mortaj vidis iam tielan duelon aŭ aŭdis pri io simila. Eniris unua en la arenon la ceremoniestro. Li esploris paŝon post paŝo la terenon por vidi, ĉu tie kuŝas ia trompo aŭ intence kaŝita objekto stumbliga aŭ faliga. Poste eniris la duenjoj, kovritaj per vualoj, ne ĝis la okuloj, sed eĉ ĝis la brusto, okupis siajn seĝojn kaj montris ne etan emociion, kiam ili vidis la hidalgon en la areno. Iom poste, eskortate de multaj trumpetistoj, aperis en alia flanko de la placo la granda lakeo Tosilos, rigide pakita en brila kaj forta armaĵo, kun la vizaĝo kovrita per la viziero de la kasko, kaj sur potenco stalono, kiu tremigis la teron per siaj paŝoj. La stalono, videble de frislanda raso, estis griza kaj masive granda, kaj de ĝiaj hufoj pendis masoj da lanecaj tufoj. La kuraĝa batalanto alrajdis, jam sufiĉe instrukciita de lia mastro la duko pri kiel li konduku al la sentima don Quijote de La Mancha, kaj pri tio, ke li tute ne devas lin mortigi, sed eviti la unuan kolizion, ĉar, se plene trafita de la kunfrapiĝo, la hidalgo perdus la vivon. Tosilos ĉirkaŭrajdis la placon, alvenis ĝis antaŭ la loko, kie sidis la duenjoj, kaj rigardis kun ioma atento al la junulino, kiu volis lin kiel edzon.

La ĉefarbitracianto de la kampo vokis la hidalgon, kiu jam troviĝis en la placo, kaj, kune kun Tosilos, turnis sin al la damoj kaj demandis, ĉu ili konsentas, ke don Quijote de La Mancha defendu ilian rajton. Ili respondis, ke jes, kaj ke la rezulton de la duelo ili konsideros valida kaj definitiva. Dume la gedukoj okupis sian lokon en supra galerio rigardanta al la areno, en kies ĉirkaŭo svarmis nekalkulebla nombro da personoj, kiuj atendis vidi la kruelan kaj teruran batalon. Estis kondiĉo de la duelo, ke, se don Quijote venkus, lia kontraŭulo edziĝus al la filino de doña Rodríguez, kaj, se li estus venkita, la alia liberiĝus de sia kompromiso kaj ne bezonus doni novan kontentigon.

La ceremoniestro dividis la sunon inter la duelantoj,^[392] kaj indikis al la du, kie ili devas situi. Batis la tamburoj, pleniĝis la aero per la sonoj de la trumpetoj, la tero tremis sub la piedoj. La koroj de la scivola popolamaso, ekscititaj de la streĉiteco de la momento, atendis, unuj kun timo kaj aliaj kun espero, la bonan aŭ mavan rezulton de la batalo. Fine, don Quijote, rekomendante sin tutkore al Dio kaj al sia sinjorino Dulcinea de El Toboso, atendis la atako-signalon. Sed nia lakeo pensis alie, kaj jen la proceso de liaj pensoj: ŝajne, kiam li rigardis sian malamikinion, li ricevis la impreson, ke neniam antaŭe li vidis virinon tiel belan kiel ŝi. Kaj la blinda infano ĝenerale nomata Amoro ne volis perdi la okazon konkeri lakean animon kaj ĝin aldoni al sia listo de triumfoj. Tiel do, nevidate kaj facile, li ĵetis ses-futan sagon en la livan flankon de la povra lakeo kaj trapikis ties koron. Kaj tion li faris tute senriske, ĉar Amoro estas nevidebla, iras kaj venas laŭplaĉe, kaj neniu petas de li konton pri liaj agoj.

Nu, kiam oni donis la signalon por la atako, nia lakeo, profunde en ekstazo, pensadis pri la belo de la damo, kiu jam mastris en lia koro. Tial li ne atentis la trumpetan sonon, dum don Quijote, apenaŭ li ĝin aŭdis, impetis kontraŭ sia malamiko kun la maksimuma rapido atingebla de Rocinante.

Lia bona ŝildisto Sancho, vidante lin galopi, diris laŭtege:

—Dio vin gvidu, kremo kaj floro de la vagantaj kavaliroj! Dio donu al vi la venkon, ĉar la rajto staras sur via flanko!

Kaj, kvankam Tosilos vidis veni la hidalgon kontraŭ lin, li ne moviĝis eĉ unu paŝon; anstataŭe, li laŭte vokis la ĉefarbitracianton, kaj kiam tiu proksimiĝis por vidi kion li volas, Tosilos demandis:

—Sinjoro, per ĉi duelo ni decidus, ĉu mi edziĝos al tiu sinjorino, ĉu ne vere?

—Jes, vere —respondis la alia.

—Nu, bone —daŭrigis la lakeo—. Mi havas skrupulon de konscienco kaj opinias, ke mi pekus, se mi daŭrigus ĉi batalon. Tiel do, mi deklaras min venkita kaj esprimas mian deziron tuj edziĝi al tiu sinjorino.

La ĉefarbitracianto miris je la vortoj de Tosilos, kaj tial, ke li estis unu el la konantoj de la sekreto de ĉi farso, li ne sciis kion respondi. Don Quijote haltis meze de sia galopado, vidante sian malamikon senmova. La duko ne povis kompreni, kial la batalo interrompiĝis, sed la arbitracianto iris komuniki al li la vortojn de Tosilos, kies decido ege surprizis kaj ekstreme furiozigis la dukon. Dume, Tosilos proksimiĝis al la loko, kie sidis doña Rodríguez kaj laŭte diris:

—Sinjorino, mi deziras edziĝi al via filino, kaj ne volas atingi per procesoj kaj disputoj, kion mi povas havigi al mi en paco kaj sen danĝero por mia vivo.

La kuraĝa don Quijote aŭdis tion kaj diris:

—Se tiel do, mia promeso ne plu ligas min. Ili edziĝu kaj havu feliĉon! Kaj se Dio donis ŝin al li, Sankta Petro ŝin benu.

La duko descendis al la placo de la kastelo, proksimiĝis al Tosilos kaj demandis:

—Ĉu vere, kavaliro, vi deklaras vin venkita, kaj volas edziĝi al ĉi knabino, puŝite de via timema konscienco?

—Jes, sinjoro —respondis Tosilos.

—Li faras bone —intervenis Sancho Panza—. Donu al la kato kion vi volis doni al la rato, kaj vi eliros vin el embaraso.

Dume Tosilos klopodis delaĉi sian kaskon, kaj suplikis, ke oni rapide lin helpu, ĉar komencis manki al li la spiro, kaj li ne povis elteni esti longe enfermita en tiel strikta pako. Oni rapide detiris lian kaskon, kaj montriĝis klare kaj evidente lia vizaĝo de lakeo. Ĉe tio, doña Rodríguez kaj ties filino kriis:

—Trompo, trompo! Oni metis Tosilos, la lakeon de mia sinjoro la duko, en la lokon de la vera edzo. Justecon de Dio kaj de la reĝo kontraŭ ĉi ruzo, aŭ pli ĝuste, kontraŭ ĉi friponaĵo!

—Ne afliktiĝu, sinjorinoj —diris don Quijote—. En ĉi afero ekzistas nek ruzo nek friponaĵo. Kaj, eĉ se io tia ekzistus, la duko ne kulpas, sed la perversaj sorĉistoj, kiuj persekutas min: en sia envio kaj ĵaluzo, kaj por eviti, ke mi akiru gloron per ĉi venko, ili transformis la vizaĝon de via edzo en la vizaĝon de ĉi viro, lakeo de la duko laŭ viaj asertoj. Sekvu mian konsilon kaj, spite al la malico de miaj malamikoj, edziniĝu al li: sendube li estas la sama viro, kiun vi deziras preni kiel edzon.

Kiam la duko aŭdis tion, lia kolero ŝanĝiĝis al deziro ridegi.

—Tiel eksterordinaraj aferoj okazas al sinjoro don Quijote —li diris—, ke mi inklinas kredi, ke ĉi viro ne estas mia lakeo. Sed ni faru la jenon: ni prokrastu la edziĝon dek kvin tagojn, se ili deziras, kaj ni tenos enfermita ĉi viron, pri kies vera personeco ni dubas, kaj eble en la dirita tempo li vidiĝos denove en sia vera figuro: certe, ne tiom daŭros la rankoro de la sorĉistoj kontraŭ la sinjoro don Quijote, des malpli, ke per siaj transformoj kaj trompoj ili ne multe sukcesas.

—Ho, sinjoro! —diris Sancho—. Ĉi friponoj havas la kutimon ŝanĝi ĉion, kio iel rilatas al mia mastro. Antaŭ kelka tempo li venkis kavaliron nomatan «de la Speguloj», kaj la sorĉistoj ŝanĝis lin en la figuron de la bakalaŭro Sansón Carrasco, nia samvilaĝano kaj granda amiko. Kaj mian sinjorinon Dulcinea

de El Toboso ili transformis en krudan kampulinon. Tiel do, mi pensas, ke ĉi lakeo estos lakeo dum sia tuta vivo, kaj ke li mortos lakeo.

Tiam intervenis la filino de doña Rodríguez, dirante:

—Kiu ajn li estas, mi dankas lin, ke li petis min kiel edzinon. Kaj vere mi preferas nomi min leĝa edzino de lakeo, ol esti disdegnata konkubino de kavaliro: kvankam mia trompinto ankaŭ ne havas rangon kavaliran.

Unuvorte, ĉi incidentoj kaj okazaĵoj finiĝis per tio, ke oni enŝlosis Tosilos por konstati, kio rezultos el lia transformiteco. Oni proklamis la hidalgon venkinto, sed la pliparto de la spektantoj sentis triston kaj senreviĝon, ĉar la dueluloj ne hakis unu la alian en pecojn: same kiel okazas al la knaboj, kiuj seniluziiĝas kiam ili atendas spekti la pendumon de kondamnito, sed li ne aperas en la ekzekutejo, ĉar lin pardonis, aŭ liaj akuzintoj, aŭ la justico.

La popolamaso disiris, la duko kaj don Quijote revenis al la kastelo, oni enfermis Tosilos, kaj doña Rodríguez kaj ties filino ege kontentis, ĉar iel aŭ alie, la afero finiĝus per edziĝo. Kaj la lakeo same tion deziris.

[391] Aludo al la Koncilio de Trento (1545-1563).

[392] T.e. li situigis ilin tiel, ke la lumo de la suno donu avantaĝon al neniu.

Ĉapitro 57

Kie oni rakontas, kiel don Quijote adiaŭis la dukon,
kaj kio okazis al li kun la senĝena kaj sprita
Altisidora, ĉambristino de la dukino

Pensis don Quijote, ke jam estas horo forlasi sian pigran vivon en la kastelo; ĉar li imagis, ke li kulpas je granda peko, permesante al si vegeti senokupa inter la nekalkuleblaj plezuroj kaj regaloj provizitaj al li de la gedukoj en lia karaktero de vaganta kavaliro. Kaj ŝajnas al li, ke ki devus prezenti al la ĉielo rigoran konton pri sia neniofarado kaj sia enfermiteco. Tiel do, unu tagon li petis de la gedukoj, ke ili permesu lin foriri. Ili konsentis, kvankam montrante profundan bedaŭron pro lia decido. La dukino donis al Sancho la leterojn de lia edzino, li ploris vidante ilin, kaj diris en si:

—Kiu povus imagi, ke la grandaj esperoj vekiĝintaj en la brusto de mia edzino Teresa Panza pro la novaĵo de mia gubernatoreco finiĝus per tio, ke mi revenas nun al la mizeraj aventuroj de mia mastro don Quijote de La Mancha? Tamen mi kontentas, ke mia Teresa kondukis laŭ sia vera naturo, sendante la glanojn al la dukino; alie, ŝia sendankeco tre afliktus min. Krome, min konsolas, ke oni ne povas nomi ĉi donacon subaĉeto, ĉar mi jam okupis la gubernatoran postenon, kiam ŝi sendis ĝin, kaj cetere, ĝustas, ke la ricevintoj de favoroj montru sian dankemon eĉ se per la donaco de nura bagatelo. Nuda mi eniris en mian postenon kaj nuda mi eliras, do, mi povas diri kun pura konscienco (kio estas ne eta merito): «nuda mi naskiĝis, nuda mi troviĝas, do sen perdo kaj gajno».

Sancho tiel parolis en si en la tago de la foriro. Don Quijote diris adiaŭ al la gedukoj la antaŭan nokton, kaj en la mateno prezentiĝis en sia armaĵo en la placo de la kastelo. Ĉiuj kastelanoj observis lin de la galerioj, kaj ankaŭ la gedukoj iris vidi lin. Sancho sidis sur sia azeno, kun sia dusako, sia valizo kaj siaj provizoj, kaj tre kontentis, ĉar la palaca majordomo (la sama, kiu ludis la rolon de Trifaldi) jam antaŭe donis al li burson kun ducent oraj eskudoj por prizorgo de la survojaj bezonoj. Kaj pri ĉi donaco don Quijote sciis ankoraŭ nenion.

Kiam, kiel dirite, ĉiuj rigardis la hidalgon, subite, de la grupo de duenjoj kaj ĉambristinoj de la dukino, leviĝis la voĉo de la senĝena kaj sprita Altisidora, kiu diris kun tono vea:

Mava kavalir', aŭskultu:
tiru iom ja la bridoj,
kaj la ĉevalaĉajn flankojn
ne plu ĝenu sprono-pikoj.
Falsakora, vi ne fuĝas
de venena reptilio,
sed de nur ŝafidineto
tro junaĝa por ŝafino.
Aĉa monstro, vi primokis
la plej belan junulinon
el la montoj de Diana
kaj el la Venusa sino.

Viren' kruela, [\[393\]](#)
vi, Ene' fuĝanta,
vin prenu Barabas' al fajr' konstanta.

Vi forportas, ho perversa!
inter viaj akraj krifoj
pecojn de la koro mia
vin amanta kun humilo.

Vi forportas tri poŝtukojn
kaj, kun ili, ŝtrump-ligilojn
de la kruroj miaj, glataj
kiel nigra-blanka silko.
Vi forportas mil pasiajn
kaj ardegajn am-suspirojn,
kiuj Trojojn mil bruligus,
se da Trojoj estus milo.

Viren' kruela, vi, Ene' fuĝanta,
vin prenu Barabas' al fajr' konstanta.

Sancho, la ŝildisto via,
krueladu per decido
teni ĉiam Dulcinean
en ties sorĉita vivo.
Vian kulpon ŝi suferu,
laŭ la ĉi-nacia stilo:
nome, ke la pekon pagu
senkulpulo, ne pekinto.
Viaj belaj aventuroj
al vi donu nur aflikton,
en la amo vi fiasku
kaj neniam havu distron.

Viren' kruela, vi, Ene' fuĝanta,
vin prenu Barabas' al fajr' konstanta.

Havu famon de falsulo
de Marchena ĝis Seviljo,
ekde Loja ĝis Granada,
de Londono ĝis Anglio.
Se vi ludos per la kartoj,
perdu ĉiam la partiojn,
kaj neniam al vi venu
aso, reĝo aŭ reĝino.

Se vi tranĉos viajn kalojn,
sangu per hemoragio;
kaj se dento via falos,
restu stump' en la gingivo!

Viren' kruela, vi Ene' fuĝanta,
vin prenu Barabas' al fajr' konstanta.

Dum la afliktita Altisidora tiel lamentis pri sia sorto, don Quijote tenis sur ŝin la rigardon, sen respondi eĉ unu vorton; poste li sin turnis al Sancho kaj diris:

—Amiko Sancho mi ĵurpetas vin, je la vivo de viaj antaŭuloj, ke vi diru al mi la veron. Respondu: ĉu eble vi portas kun vi la la tri poŝtukojn kaj la ĵartelojn menciitajn de ĉi sopiranta pucelo?

—Mi portas la tri poŝtukojn —respondis Sancho—. Sed tute ne la ĵartelojn.

La dukino miris ĉe la senĝeneco de Altisidora, ĉar ŝi konsideris la knabinon petola kaj iom liberkondukta, sed ne tiel frivole aŭdaca. Krome, la dukino des pli surpriziĝis, ĉar ŝi ne estis antaŭe informita pri ĉi nova mistifiko. La duko volis puŝi pli antaŭen la ŝercon kaj diris:

—Sinjoro kavaliro, ne ŝajnas al mi bone, ke post ol oni akceptis vin plej gastame en ĉi kastelo, vi kuraĝas permesi al vi forporti almenaŭ tri poŝtukojn de mia ĉambristino kaj, aldone, eĉ paron de ŝiaj ĵarteloj. Kaj tia faro ne indas al nobla koro, nek bone kongruas kun via reputacio. Redonu al ŝi la ĵartelojn: alie, mi defios vin al ĝismorta duelo, kaj ne timos, ĉu viaj friponaj sorĉistoj ŝanĝos aŭ transformos al mi la vizaĝon, kiel ili faris al Tosilos, mia lakeo batalinta kontraŭ vi.

—Dio ne volu —respondis don Quijote—, ke mi elingu mian glavon kontraŭ via ekscelenca moŝto, de kiu mi ricevis tiom da favoroj. La poŝtukojn mi redonos, ĉar Sancho diras, ke li ilin havas; sed tute ne la ĵarterlojn, ĉar neniam mi havis ilin, kaj ankaŭ ne Sancho. Kaj se via ĉambristino volus bone serĉi en siaj kestoj kaj ujoj, certe ŝi trovos ilin. Sciu, sinjoro duko, ke mi neniam ŝtelis, nek pensas ŝteli en la cetero de mia vivo, se Dio plu protektos min. Ĉi pucelo parolas kiel amofrapita persono, kion ŝi konfesas, kaj pri ŝia stato mi ne kulpas. Do, mi ne havas motivon peti pardonon de ŝi aŭ de via ekscelenca moŝto. Kaj mi suplikas vin, sinjoro, ke vi havu pli bonan opinion pri mi, kaj donu novan permeson, ke mi sekvu vian vojon.

—Dio gardu vin —diris la dukino—, kaj ni ĉiam ricevu bonajn novaĵojn pri viaj faroj. Bonan vojaĝon, sinjoro don Quijote, kaj jam ekiru, ĉar ju pli vi restos ĉi tie, del pli intense ardos la flamo, kiun la ĉeesto de via moŝto ekscitas en la brusto de la puceloj vin admirantaj. Rilate al mia ĉambristino, mi punos ŝin tiamaniere, ke de nun, ŝi ne eksterlimiĝos per agoj aŭ per vortoj.

—Aŭskultu nur unu vorton plian, ho kuraĝa don Quijote! —diris tiam Altisidora—. Pardonu min, ke mi asertis, ke vi ŝtelis miajn ĵartelojn. Nu, mi ĵuras je Dio kaj je mia animo, ke mi havas ilin surmetitaj. Okazis al mi, kiel al la viro, kiu foje serĉis sian azenon, dum li rajdis ĝin.

—Kion mi diris do? —intervenis Sancho—. Kaj oni kredis min kapabla fari ŝtelon! Se mi estus volinta ŝteli, mi havis belegan okazon en mia gubernatora posteno!

Don Quijote riverence klinis la kapon antaŭ la gedukoj kaj la ceteraj ĉeestantoj, deturnis la ĉevalon per la brido, elrajdis el la kastelo, sekvate de Sancho sur la azeno, kaj ekiris survoje al Zaragoza.

[393] Vireno, duko de Zelando, forlasis en dezerta insulo Olimpian, filinon de la grafo de Holando, sian favorantinon kaj amatinon. Ariosto traktas ĉi aferon en sia *Rolando freneza*.

Ĉapitro 58

Kie don Quijote renkontas tiom da aventuroj, ke ili apenaŭ havas tempon sekvi unu la alian

Kiam don Quijote vidis sin en la aperta kamparo, libere kaj ne embarasate de la persekutema Altisidora, ŝajnis al li, ke li vivas denove en sia elemento, kaj ke lia spirito refreŝiĝas por plu sekvi la vojon de la kavalirismo. Kaj turnante sin al Sancho, li diris:

—La libero, Sancho, estas unu el la plej valoraj donacoj faritaj de la ĉielo al la homoj. La riĉoj kaŝitaj en la tero aŭ en la maro neniel kompareblas al la libero. Por la libero, tiel same kiel por la honoro, oni devas kaj rajtas riski la vivon; kaj, kontraŭe, la sklaveco estas la pleja mavo, kiu povas fali sur la homojn. Mi diras tion, Sancho, ĉar vi atestis, kiom da regalo kaj abundo ni ĝuis en la kastelo. Nu, meze de la frandindaj pladoj kaj de la freŝaj trinkaĵoj de la festenoj, ŝajnis al mi, ke mi suferis la rigoron de la malsato, ĉar mi ne gustumis ilin kun la libero, kiun mi havus, se ili apartenus al mi. Ja la devo reciproki la favorojn kaj bonfarojn ricevatajn metas en katenon la liberon de la spirito. Feliĉa vivas la homo, al kiu la ĉielo donas pecon da pano, sen ke li havu la devon danki pro ĝi ajnan personon, krom la ĉielo mem.

—Tamen —respondis Sancho— ne decus ne montri de nia flanko ian dankemon pro la burseto kun la ducent oraj eskudoj, kiun donis al ni la majordomo de la duko, kaj kiun mi portas sur la koro kiel kataplasmon kaj konsolilon por ajna eventualo: ĉar ne ĉiam ni trovos kastelojn, kie oni regalos, kaj eĉ povus okazi, ke ni trafos en gastejojn, kie oni nin tradraŝos.

Tiel parolante pri diversaj aferoj, rajdadis la vagantaj kavaliro kaj ŝildisto, kaj apenaŭ iris proksimume tri mejlojn, vidis, ke dekduo da viroj en kampulaj vestoj sidas sur siaj manteloj etenditaj sur eta kampo de verda herbo kaj manĝas. Apud la viroj vidiĝis nombro da blankaj tukoj (kelkaj kuŝe, kelkaj stare, kaj metitaj en kelka distanco unuj de la aliaj) kiuj ŝajnis kovri ion. Don Quijote proksimiĝis al la manĝantoj, ĝentile ilin salutis, kaj demandis kion la tukoj kovras.

—Sinjoro —respondis unu el la viroj—. Sub ĉi tukoj kuŝas kelkaj figuroj el skulptita ligno, kaj ili formas parton de retablo, kiun ni konstruas en nia vilaĝo.

Ni portas ilin kovritaj por eviti ilian makuliĝon, kaj surŝultre, por ke ili ne rompiĝu.

—Al mi tre plaĉus vidi ilin, se vi bonvolas ilin montri —diris don Quijote—. Figuroj tiel zorge traktataj sendube estas tre bonaj.

—Sendube ja —diris alia—. Ilia prezo tion konfirmas. Eĉ ne unu el ili kostas malpli ol kvindek dukatojn, kaj por pruvi, ke ni diras la veron, atendu momenton: viaj propraj okuloj juĝu.

Tiam li stariĝis, interrompante sian manĝadon, detiris la kovron de la unua figuro kaj aperis, prezentita en la kutima feroça pozo, Sankta Georgo surĉevale kaj kun sia lanco enpuŝita tra la buŝo de retordiĝanta serpento. La tuta figuro similis, kiel oni ordinare diras, al ora flamo, kaj don Quijote, ĝin vidante, diris:

—Ĉi kavaliro, rangis inter la plej bonaj de la ĉiela milico. Li nomiĝis don Sankta Georgo kaj, krome, estis protektanto de puceloj. Nu, ni vidu ĉi alian figuron.

La viro detiris la tukon kaj aperis Sankta Marteno en la momento kiam, rajde sur ĉevalo, dividas sian mantelon kun paŭpera viro. Apenaŭ vidinte la figuron, don Quijote komentis:

—Ankaŭ ĉi kavaliro estis unu el la kristanaj aventuristoj, kaj mi opinias, ke li montriĝis pli donacema ol kuraĝa. Rimarku, Sancho, ke li dividas sian mantelon kun la paŭpera kaj donas al li la duonon. Sendube li faris la dividon en la vintro, ĉar, se en alia sezono, li donacus la kompletan mantelon, se konsideri lian grandan karitaton.

—Eble ekzistis alia motivo —diris Sancho—. Eble tenis sin al la proverbo: «Kiu tenas kaj donas, tiu saĝon bezonas».

Ridis don Quijote, petis detiri alian tukon, kaj sub ĝi vidiĝis la rajdanta figuro de la patrono de Hispanio, kun sangokovrita glavo, renversante maŭrojn kaj surtretante ties kapojn. Ĉe tia figuro don Quijote diris:

—Jen vera kavaliro! Kaj membro de la skadroj de Kristo! Li nomiĝas don Santiago, Mortiganto de Maŭroj, unu el la plej kuraĝaj kaj sanktaj inter la kavaliroj kiuj vivis en la mondo kaj nun loĝas en la ĉielo.

Poste oni detiris alian kovron, kaj montriĝis la falo de Sankta Paŭlo de sur la ĉevalo, kun la ceteraj detaloj kutime pentrataj por bildigi la epizodon de lia konvertiĝo. La figuro aspektis tiel vivo-simila, ke oni povus diri, ke Sankta Paŭlo vere parolas, responde al la vortoj de Kristo.

—Ĉi homo —diris don Quijote— estis en sia tempo la plej granda malamiko de la Eklezio de Dio Nia Sinjoro, kaj poste ĝia plej arda defendanto nesuperebla en ajna epoko. Li vivis kiel vaganta kavaliro kaj mortis kiel paca sanktulo, laboradis senlace en la vinberĝardeno de Nia Sinjoro kaj instruis la

paganan genton. Lia lernejo estis la ĉielo, kaj li havis Jesuo-Kriston kiel profesoron kaj majstron.

Ne estis pli da figuroj, kaj don Quijote petis, ke oni kovru ilin denove. Poste li diris al iliaj portantoj:

—Fratoj, mi konsideras bona aŭguro la fakton, ke mi vidis kion mi vidis, ĉar ĉi sanktuloj kaj kavaliroj havis mian saman profesion, t.e. la profesion de la armoj. Ekzistas nur la diferenco, ke ili estis sanktuloj kaj batalis di-inspire, dum mi esta pekanto kaj batalas laŭ la maniero de la homoj. Ili konkeris la ĉielon per la forto de la brakoj, ĉar la regno de la ĉielo estas perfortata,^[394] kaj ĝis nun mi ne scias, kion mi konkeras per mia penado. Sed, se mia Dulcinea de El Toboso liberiĝus de siaj suferoj, se pli bona sorto min akompanus, kaj se mia spirito revigliĝus, eble mi direktus miajn paŝojn al pli bona vojo, ol la nuna de mi sekvata.

—Dio vin aŭskultu, kaj la diablo estu surda —diris Sancho.

La viroj tiel same miris je la aspekto kiel je la vortoj de don Quijote, kaj apenaŭ komprenis la duonon de liaj esprimoj. Ili finis manĝi, ŝarĝis sin per la figuroj, diris adiaŭ al don Quijote kaj plu iris sian vojon. Sancho denove surpriziĝis ĉe la scio de lia mastro, kvazaŭ li ne konus lin de longe, kaj ŝajnis al li, ke en la mondo ne ekzistas historio aŭ evento, kiun don Quijote ne havus sur la pinto de la fingro aŭ gravurita en sia memoro.

—Vere, sinjoro mastro —li diris—, se tio ĵus okazinta al ni povas ricevi la nomon de aventuro, temas pri unu el la plej dolĉaj kaj agrablaj trafintaj nin ĝis nun en niaj vagadoj: ni finis ĝin sen ricevi vergojn sur la korpon aŭ tim-skuon en la animo, sen elingi la glavon, sen falegi sur la teron kaj sen suferi malsaton. Dio estu benata, ke Li permesas min vidi ion tian per miaj propraj okuloj!

—Prave vi parolas, Sancho —diris don Quijote—. Sed rimarku, ke la tagoj sekvas sin, sed ne similas unu la alian. Konvenas, ke la saĝaj personoj konsideru tion, kion la popolo nomas omenoj (ordinare ne bazitaj sur la natura ordo de la aferoj) kiel nuran koincidon de cirkonstancoj. Nu, okazas, ke unu kredanto je la omenoj ellitiĝas en la mateno, eliras el la hejmo, renkontas monaĥon de la ordeno de Sankta Francisko kaj, kvazaŭ li estus vidinta grifon, turnas la dorson kaj kuras revene al sia domo. Alia superstiĉulo senvole verŝas salon sur la tablon, kaj, tiam, en lia koro verŝiĝas la melankolio, kvazaŭ la naturo havus la devon avizi, per tiel bagatelaj signoj, pri venontaj misfortunoj. La homo prudenta kaj kristana ne devas tro scivoli pri la intencoj de la ĉielo. Nu, Scipiono alvenas al Afriko, stumblas, kiam li alsaltas sur teron, kaj ties soldatoj vidas en tio mavan aŭguron. Sed li brakumas la grundon kaj diras: «Afriko, vi ne povos forkuri, ĉar mi tenas vin inter miaj brakoj». Tiel do, Sancho, mia renkonto kun la figuroj estis feliĉa momento.

—Sendube —respondis Sancho—. Sed mi dezirus, ke via moŝto klarigu al mi, kial la hispanoj, kiam ili eniras en batalon, alvokas la protekton de Santiago la Mortiganto de Maŭroj, kriante: «Santiago, kaj fermu Hispanio!».^[395] Ĉu tio signifas, ke Hispanio estas aperta, kaj ke necesas fermi, aŭ pri kia ceremonio temas?

—Kiel stulta vi estas Sancho! —diris don Quijote—. Sciu, ke Dio donis al Hispanio ĉi grandan kavaliron de la ruĝa kruco, kiel ties patronon kaj protektanton, ĉefe en la desperaj bataloj de la hispanoj kontraŭ la maŭroj—. Tial, ili alvokas lin, por ke li ilin helpu en ties bataloj. Kaj ofte oni vidis lin renversi, surtreti, detruu kaj ekstermi la arabajn skadrojn: kaj ĉi-rilate mi povus rakonti al vi multe da ekzemploj prenitaj de la aŭtentaj hispanaj historioj.

Sancho ŝanĝis la temon de la konversacio, dirante al sia mastro:

—Mi miras, sinjoro, je la senĝeneco de Altisidora, la ĉambristino de la dukino. La tiel nomata Amoro sendube trapikis kaj vundis ŝin plej kruele. Oni asertas, ke Amoro estas blinda bubo. Sed malgraŭ siaj mukaj, aŭ pli ĝuste senvidaj okuloj, se li alcelas koron, eĉ se plej etan, li ĝin trafas kaj trapikas per siaj sagoj. Mi aŭdis ankaŭ, ke liaj amaj sagoj senpintiĝas kaj perdas sian penetremon kontraŭ la ĉasto kaj la pudoro de la puceloj. Sed en la kazo de Altisidora, ŝajnas, ke la sagoj, anstataŭ senpintiĝi, fariĝis pli akraj kaj penetraj.

—Ne forgesu, Sancho —respondis don Quijote—, ke la amo, en sia konduto, nek respektas limojn, nek teniĝas al la postuloj de la racio. Ĝi posedas la saman naturon de la morto, kiu frapas la orgojlan palacon de la reĝoj same kiel la humilan kabanon de la paŝtistoj; kaj, kiam la amo plene invadas ies koron, ĝia unua zorgo estas peli de ĝi la timon kaj la honton, kaj tial, Altisidora senhonte proklamis sian pasion, kiu vekis en mia brusto, ne kompaton, sed konfuzon.

—Kia kruelo! —kriis Sancho—. Kia nekredebla manko de dankemo! Mi povas diri de mia flanko, ke mi tuj cedus kaj fariĝus ŝia sklavo, ĉe ŝia plej eta sugesto. Bastardo! Kia marmora koro, kiaj bronzaĵaj visceroj, kia mortera animo! Sed mi ne povas imagi kion vidis Altisidora ĉe via moŝto kapablan logi kaj konkeri ŝin. Kia eleganto, kia ĉarmo, kia gracio, kia vizaĝo povis, kune aŭ unuope, enamigi ŝin al vi? Se konfesi la veron, mi ofte rigardas vin de la pinto de la piedoj ĝis la lasta haro de via kapo, kaj tio, kion mi vidas, pli repuŝas ol allogas. Kaj, se kiel mi same aŭdis, la belo estas la unua kaj ĉefa inspirfonto de la amo, mi ne komprenas al kio enamiĝis la povra knabino, se konsideri, ke, da belo, via moŝto havas nenion.

—Sciu, Sancho —respondis don Quijote—, ke ekzistas du specoj de belo: la spirita kaj la korpa. La spirita montriĝas kaj brilas per inteligento, pudoro, bona konduto, larĝ-animeco kaj ĝentilo, kaj ĉi kvalitoj povas sidi en turpa homo. Kaj, kiam oni prefere atentigas ĉi specon de belo, ne la belon korpan, tiam la amo fontas kun granda impeto. Mi bone scias, Sancho, ke mi ne estas bela: sed scias ankaŭ, ke mi ne estas deformita. Sufiĉas, ke honesta homo nur ne havu monstran aspekton, por ke oni lin serioze amu, kondiĉe, ke li posedas la animajn kvalitojn antaŭe menciitajn.

Tiel parolante, ili deviis de la vojo en arbaron, kaj subite kaj neatendite don Quijote vidis sin implikita en retoj verdafadenaj pendigitaj inter kelkaj arboj. Tute perpleksa, la hidalgo diris al Sancho:

—Ŝajnas al mi, Sancho, ke ĉi afero de la retoj certe turniĝos en unu el la plej strangaj aventuroj imageblaj. Oni min pendumu, se la sorĉistoj min persekutantaj ne intencas ĉirkaŭvolvi min en la reton, ke mi ne povu sekvi mian vojon, kvazaŭ ili volus fari venĝon pro mia rigora maniero trakti Altisidoran. Sed ili sciu, ke eĉ se ĉi retoj estus teksitaj, ne per verdaj fadenoj, sed per duraj diamantoj, aŭ estus pli fortaj ol la reto uzita de la ĵaluza dio de la forĝistoj^[396] por impliki Venuson kaj Marson, mi facile disrompus ilin, kiel reton el junkoj aŭ el kotonaj fibroj.

Kaj, kiam li intencis antaŭenpuŝi sin kaj trarompi ĉion, subite aperis el inter kelkaj arboj du belegaj paŝtistinoj, aŭ almenaŭ du junulinoj en paŝtistinaj kostumoj, kvankam iliaj pelerinoj estis el fajna brokato, kaj la jupoj el muara silko ora. Iliaj blondaj haroj, lozaj sur la ŝultroj, povus konkuri kun la radioj de la suno mem, kaj ilin kronis girlandoj el verda laŭro kaj ruĝa amaranto. Laŭaĝe ili havis ne pli ol dek ok jarojn kaj ne malpli ol dek kvin. Antaŭ tia apero, Sancho gapis, don Quijote stuporis, la suno haltis por admiri la

knabinojn, kaj la kvar gardis mirindan silenton. Fine parolis unu el la paŝtistinoj, dirante al don Quijote:

—Haltu, sinjoro kavaliro, ne rompu la retojn: oni ilin pendigis, ne por via damaĝo, sed por nia distro. Kaj tial, ke mi scias, ke vi demandos al ni, por kio ni ilin uzas, kaj kiuj ni estas, mi jam respondas al vi koncize, ke en urbeto proksimume ses mejlojn de ĉi tie, kie vivas multaj hidalgoj kaj riĉaj personoj, nombro da ili kun siaj edzinoj, gefiloj, najbaroj kaj parencoj interkonsentis veni distri sin al ĉi loko, unu el la plej agrablaj de la regiono, kaj formi unu novan Arkadion: tiucele la knabinoj alivestis sin per kostumoj laŭstile paŝtistinaj, kaj la junuloj per paŝtistaj. Ni parkeris du eklogojn, unu de la fama poeto Garcilaso, kaj la alian de la senegala Camoens, en ties propra lingvo portugala, kiujn pecojn ni ankoraŭ ne ludis. Hieraŭ ni alvenis ĉi tien, starigis tendojn sur la bordo de rojo, kies riĉa fluo akvas ĉi herbejojn, kaj hieraŭ nokte etendis ĉi reton inter la arboj por kapti la simplajn birdetojn, ĉar, pelate de niaj krioj, ili forflugas ĉi tien kaj enretiĝas. Se vi deziras, sinjoro, esti nia gasto, oni vin kompleze kaj larĝ-anime regalos: ni ne konsentas, ke, almenaŭ nuntempe, enpaŝu ĉi tien zorgoj aŭ afliktoj.

Ŝi ĉesis paroli, kaj nenion plu diris. Tiam don Quijote respondis:

—Vere, belega sinjorino, kiam antaŭ la okuloj de Akteono subite aperis Diana sin bananta, certe li ne sentis pli da miro kaj surprizo, ol mi sentas antaŭ via belo. Mi ŝatas vian manieron vin distri kaj dankas vian inviton. Kaj se mi povas servi vin, ordonu min, kaj mi vin obeos senhezite: ĉar mi ne havas alian profesion ol montri mian dankemon kaj fari bonon al ĉiuj, speciale al homoj alta-rangaj, kiaj vi ŝajnas. Kaj se ĉi retoj, kapablaj okupi nur etan spacon, okupus la tutan sferon de la tero, mi serĉus, por eviti ilin rompi, elpaŝi tra nova universo. Nu, se vi trovas miajn vortoj iom tro

emfazaj, kaj ne plene kredas ilin, sciu, ke tion promesas al vi, ne ajna ulo, sed don Quijote de La Mancha, nomo kiu eble estas al vi konata.

—Ho, kara amikino! —kriis tiam la alia paŝtistino—. Kia feliĉo! Ĉu vi vidas ĉi sinjoron, ĉi tie antaŭ ni? Nu, sciu, ke li estas la plej kuraĝa, la plej enamiĝinta, la plej ĝentila de la mondo, se ne mensogas kaj trompas la historio de liaj prodaĵoj, jam eldonita en formo de libro, kiun mi legis. Kaj mi vetus, ke ĉi bonulo lin akompananta estas lia ŝildisto Sancho Panza, kies burleska naturo ne havas rivalon.

—Jes, vi pravas —diris Sancho—. Mi estas la burleska ŝildisto pri kiu via moŝto parolas, kaj ĉi sinjoro mia mastro, la menciita kaj enhistoriigita don Quijote de La Mancha en persono.

—Ho! —kriis la alia knabino—. Kara, ni petu lin resti, ĉar niaj familioj ege ĝojos teni lin kun si. Ankaŭ mi aŭdis pri liaj kuraĝo kaj ĉarmo. Oni ĉefe diras pri li, ke li estas la plej firma kaj lojala amanto konata, kaj ke la tuta Hispanio konsideras lian sinjorinon, ian Dulcinea de El Toboso, kiel kulminon de belo.

—Prave konsiderata —respondis don Quijote—, kaj nur via senegala ĉarmo povus ĵeti ian ombron al tia aserto. Ne insistu, sinjorinoj, reteni min, ĉar la rigoraj devoj de mia profesio permesas min nenie ripozi.

En ĉi momento alvenis la frato de unu el la paŝtistinoj, ankaŭ vestita laŭ la paŝtista stilo, kun la sama riĉo kaj eleganto. La knabinoj lin informis, ke la kavaliro estas don Quijote de La Mancha, kaj la alia ties ŝildisto Sancho Panza, kaj ke certe li renkontas ilin, ĉar li jam legis ilian historion. La brava paŝtisto salutis kaj invitis la hidalgon akompani lin al iliaj tendoj, kaj fine don Quijote cedis al liaj petoj.

Dum ili tiel babilis, okazis la batuo, kaj la reto pleniĝis per diversaj birdetoj, ĉar, trompitaj de ĝia verda koloro, ili falis en la danĝeron, kiun ili volis eviti. Apud la retoj kolektiĝis pli ol tridek personoj en elegantaj kostumoj paŝtistaj kaj paŝtistinaj, eksciis, kiuj estas don Quijote kaj lia ŝildisto, kaj tre ĝojis, ĉar ili jam konis la hidalgon pere de lia presita historio. Poste ili revenis al la tendoj, trovis tie la tablojn riĉe, abunde kaj elegante primetitaj, kaj honoris la hidalgon, cedante al li la ĉefan lokon. Ĉiuj lin rigardis, kaj ĉiuj miris, vidante lin. Fine oni demetis la tablotukon, kaj don Quijote diris kun sonora kaj emfaza voĉo:

—Kvankam kelkaj asertas, ke la plej granda peko homa estas la orgojlo, mi diras, ke ĝi estas la sendanko. Kaj mi bazas mian opinion sur la diro, ke «la infero plenas de sendankuloj». Jam de kiam mi komencis havi racian aĝon, mi klopodis forkuri de ĉi peko: kaj se mi povas reciproki per aliaj favoroj la favorojn ricevitajn, mi almenaŭ klopodas reciproki; tamen, se miaj klopodoj ne sufiĉas, mi publike deklaras, ke mi ricevis favorojn. Ĉar, kiam oni diras kaj proklamas ĉion bonan, kion oni ricevas, volonte oni reciprokus, eĉ pli larĝanime, la favoron mem, se oni povus. Sed ordinare okazas, ke la ricevantoj ne havas la rimedojn de la donantoj. Jen kial Dio staras super ni ĉiuj: Li estas la plej granda donanto, kaj la donoj de la homoj ne povas kompariĝi al la Liaj, ĉar inter ili kaj Li ekzistas infinita distanco. Tamen ĉi mankon kaj nesufiĉon oni povas iel kompensi per la dankemo: tiel do, mi estas danka pro la favoroj al mi faritaj ĉi tie, kaj, nekapabla reciproki en simila maniero, ĉar mi devas teni min inter la limoj de miaj modestaj rimedoj, mi proponas al vi reciproki per tio, kion mi havas kaj kapablas. Sekve, mi deklaras, ke dum du tagoj, meze de la vojo kondukanta al Zaragoza, mi asertos, ke ĉi du damoj en paŝtistinaj kostumoj estas la plej belaj kaj ĝentilaj de la tuta mondo, se escepti nur la senegalan Dulcinea de El Toboso, unika mastrino de mia

koro. Kaj tion mi diras, tute sen ia ofenda intenco kontraŭ miaj geaŭskultantoj.

Sancho, aŭskultinte lin kun granda atento, diris tre laŭte:

—Ĉu eble ekzistas en la mondo personoj kapablaj aserti kaj ĵuri, ke mia mastro estas freneza? Vi mem diru, sinjoroj paŝtistoj: ĉu ajna vilaĝa pastro, eĉ plej saĝa kaj studema, povus paroli kiel mia mastro, aŭ ajna vaganta kavaliro, eĉ plej fame kuraĝa, povus proponi kion mia mastro proponis ĉi tie?

Kun vizaĝo ruĝa de kolero don Quijote turnis sin al Sancho kaj diris:

—Ĉu eble, ho Sancho!, oni povus trovi en la tuta mondo unu solan personon, kiu asertus, ke vi ne estas idioto, ia sako da stultaĵoj garnita per friponeco kaj malico? Kiu donis al vi permeson entrudi vin en miajn aferojn kaj ekzameni, ĉu mi estas saĝa aŭ freneza? Silentu, ne respondu: selu la ĉevalon, se ĝi ne havas jam la selon surmetita, kaj ni iru efektivigi mian proponon. La rajto staras sur mia flanko, do, se iu kontraŭdiros min, anticipe konsideru lin venkita.

Kun granda kolero kaj indigno don Quijote stariĝis de sia seĝo, dum la ĉeestantoj miris ĉe lia konduto, kaj ne sciis, ĉu konsideri lin saĝa aŭ freneza. Tamen ili provis persvadi lin ne persisti en sia entrepreno, dirante, ke ili jam estas bone konvinkitaj rilate al lia dankema naturo, kaj ke li ne bezonas fari novajn montrojn de dia kuraĝo, ĉar sufiĉas la prodaĵoj rakontitaj en lia historio. Malgraŭe, don Quijote persistis en sia decido kaj, jam sur Rocinante, fiksas la ŝildon al la brako, prenis la lancon kaj posteniĝis meze de la vojo, ne tre dista de la herbejo. Sancho, rajde sur sia azeno, sekvis lin, same kiel la tuta grupo de paŝtistoj, scivolaj vidi, kio rezultos el lia aroganta kaj eksterordinara defio.

Lokita do meze de la vojo, don Quijote ŝiris la aeron per la jenaj vortoj:

—Ho vi, pasaĝeroj, vojaĝantoj, kavaliroj, ŝildistoj, irantoj piede aŭ rajde, nun aŭ en la proksimaj du tagoj! Sciu, ke don Quijote de La Mancha, vaganta kavaliro, postenas ĉi tie por aserti, ke la nimfoj de ĉi herbejoj kaj arbaroj superas (se escepti nur la mastrinon de mia koro, Dulcinea de El Toboso) ĉian ceteran belon kaj ĝentilon de la mondo. Tiel do, se iu havas kontraŭan opinion, li venu. Mi atendas lin ĉi tie.

Dufoje li ripetis la saman defion, kaj dufoje neniam aventuristo aŭskultis ĝin. Sed la sorto, kiu kondukis lin de bono en pli bonon, volis ke, iom poste, aperu sur la vojo grandega nombro da surĉevalaj viroj, multaj kun lancoj en la manoj, rajdante tre rapide en kompakta grupo. La paŝtistoj ekvidis la lavangon, turnis la dorson kaj longe apartiĝis de la vojo, ĉar ili komprenis, ke, restante tie, ili endanĝeriĝus. Nur don Quijote, trankvila kaj sentima, ne moviĝis de sia loko, dum Sancho Panza sin ŝirmis post la grupo de Rocinante. Alvenis la skadro da lanculoj, kaj unu el ili, rajdante iom antaŭe, komencis krii al don Quijote:

—Iru for de la vojo, viro de la diablo, se vi ne volas, ke ĉi taŭro turnu vin en pulpon!

—Nu, friponoj! —respondis don Quijote—. La taŭroj tute ne donas al mi zorgon, eĉ se ili estas la plej ferocaj bredataj ĉe la rivero Jarama! Konfesu senrezerve, kanajloj, la veron de mia proklamo! Se ne, batalu kontraŭ mi!

La lanculo ne havis tempon respondi, nek don Quijote por devii, eĉ se li volus, ĉar la sinpela grego el kvietaj bovoj kaj sovaĝaj taŭroj (kune kun la granda nombro da lanculoj kaj aliaj personoj, kiuj kondukis la bestojn survoje al vilaĝo, kie okazus taŭrluda spektaklo la sekvantan tagon) trete pasis

sur la korpoj de don Quijote, Sancho, Rocinante kaj la azeno, ilin renversinte kaj rulinte. Sancho kuŝis muelita, don Quijote terurita, la azeno trabatita, kaj Rocinante en ne tre enviinda stato. Sed fine la kvar stariĝis, kaj don Quijote komencis stumble-fale kuri post la gregon, kriante:

—Haltu kaj atendu, fripona kanajlaro! Nur unu kavaliro vin defias, kaj lia naturo ne permesas lin opinii kiel aliaj, ke «al malamik' en kuro faru ponton kun plezuro».

Sed la tumultaj kurantoj ne haltis, ĉar ili zorgis pri liaj minacoj kiel pri la nuboj pasintjaraj. Tute laca, don Quijote fine sin detenis kaj, pli furioza ol venĝita, sidiĝis ĉe la vojo kaj atendis la alvenon de Sancho, Rocinante kaj la azeno. Poste la mastro kaj la ŝildisto ekrajdis kaj, sen iri adiaŭi la ŝajnan aŭ falsan Arkadion, sekvis sian vojon, pli hontaj ol kontentaj.

[394] El la Biblio (Mateo 11,12).

[395] Laŭlitera traduko de la jam glosita hispana batalkrio. «Fermi», en la hispana («cerrar») signifas ankaŭ, interalie, ataki por veni en korpo-kontraŭ-korpan batalon (vidu notojn al ĉapitro 4-a de la dua parto).

[396] Vulkano, Romana dio de la fajro kaj forĝado.

Ĉapitro 59

Pri eksterordinara incidento, kiun oni povus nomi aventuro, okazinta al don Quijote

Don Quijote kaj Sancho trafis, en freŝa bosketo, klaran kaj puran rojon, sur kies bordo ili trovis rimedon kontraŭ la polvo kaj la laco rezultintaj el la senkonsidera konduto de la taŭroj. La trabatita paro lasis liberaj, sen bridoj kaj seloj, la ĉevalon kaj la azenon, kaj sidiĝis por ripozi. Sancho turnis sin al sia dusako kaj elprenis el ĝi kion li kutime nomis «condumio».^[397] La ŝildisto gargaris sian buŝon, don Quijote lavis al si la vizaĝon, kaj la freŝo de la akvo iom stimulis ilian deprimitan spiriton. Don Quijote manĝis neniom kaŭze de sia aflikto, kaj Sancho ne kuraĝis tuŝi la manĝon pro ĝentilo, kaj atendis, ke lia mastro komencu unua. Sed, vidante lin tiel absorbita en pensoj, ke li eĉ forgesis preni panpecon al sia buŝo, Sancho diris nenion kaj spite al ĉiaj reguloj de bonedukiteco, komencis gluti la panon kaj la fromaĝon, kiuj kuŝis antaŭ li.

—Manĝu, amiko Sancho —diris don Quijote—. Flegu la vivon, pli gravan al vi ol al mi, kaj lasu min morti sub la pezo de miaj zorgoj kaj de miaj misfortunoj. Mi, Sancho, venis en la mondon por vivi mortante, kaj vi por morti manĝante. Kaj por ke vi vidu, ke ĉi-rilate mi diras la veron, konsideru, ke mi estas protagonisto de libroj, fama pro miaj prodaĵoj, ĝentila en mia konduto, respektata de princoj, sopirata de puceloj... kaj fine, kiam mi atendis laŭrojn, kronojn kaj triumfojn kiel merititan rekompencan pro miaj kuraĝaj faroj, mi vidis min ĉi-matene surtretata, kalcitrata, batata de la hufoj de bestoj naŭzaj kaj sordidaj. Ĉe tia penso miaj dentoj agaciĝas, miaj molaroj paraliziĝas, miaj manoj svenas, kaj absolute mankas

al mi la deziro manĝi, tiom ke mi pensas lasi min morti de malsato, t.e. de la plej kruela el la mortoj.

—Se tiel —respondis Sancho, senhalte maĉante—, via moŝto certe ne aprobas la proverbon: «Oni manĝu ĝis krevo, eĉ se tiel morto venos». Se paroli pri mi, mi ne pensas preni de mi la vivon: kontraŭe, mi faros kiel la ŝuisto, kiu streĉas la ledon per la dentoj, ĝis ĝi atingas la deziratan longon. Mi longigos mian vivon manĝante, ĝis ĝi atingos la finon signitan de la ĉielo. Sciu, sinjoro, ke ne ekzistas pli granda frenezaĵo ol morti de despero, kiel vi volas. Sekvu mian konsilon, manĝu, poste kuŝiĝu dormi iom sur la verdaj matracoj de ĉi herboj, kaj, kiam vi vekiĝos, vi sentos vin pli animita.

Don Quijote konsentis, ĉar ŝajnis al li, ke la vortoj de Sancho havis pli da filozofio ol da stulto. Kaj li respondis:

—Se vi, ho Sancho!, bonvolus fari por mi kion mi nun diros, mia reanimiĝo estus pli certa, kaj mia aflikto ne tiel granda. Jen la afero: dum mi dormos, sekvante vian konsilon, vi devus iom devii de ĉi tie, elmeti vian pugon al la aero kaj per la brido de Rocinante skurĝi vin tricent aŭ kvarcent fojojn, partopage de la tri mil kaj kelkaj batoj, kiujn vi devas doni al vi por la elsorĉo de Dulcinea; ĉar estas vere bedaŭrinde, ke la povra sinjorino suferas ankoraŭ sian ensorĉitecon pro via forgesemo kaj neglekto.

—Oni povus multe paroli pri tio —diris Sancho—. Por la momento, ni ambaŭ dormu, kaj poste Dio disponos. Via moŝto sciu, ke skurĝi sin frida-sange estas kruela afero, des pli, se la batoj falus sur korpon mankan je nutro kaj manĝo. Mia sinjorino Dulcinea havu paciencon, ĉar en la plej neatendita momento, ŝi vidos min transformiĝinta en kribrilon kaŭze de la vipobatoj. Kaj la vivo daŭras ĝis la morto: mi volas diri, ke mi vivas ankoraŭ, kaj ke samtempe mi havas la deziron plenumi mian promeson.

Don Quijote lin dankis, manĝis iomete —kaj Sancho multe— kaj ambaŭ kuŝiĝis dormi, dum la du konstantaj amikoj kaj kompanoj, Rocinante kaj la azeno, laŭvole kaj libere paŝtiĝis sur la verda herbo, tre abunda en tiu loko.

Ili vekiĝis iom tarde, surseliĝis, sekvis sian vojon kaj rapidis por alveni al gastejo, videble staranta proksimume tri mejlojn for. Kaj mi diras gastejo, ĉar don Quijote donis al ĝi ties nomon, kontraŭ sia kutimo preni ĉiun gastejon por kastelo.

Alveninte, ili demandis al la gastejestro, ĉu li disponas ĉambron. Li jese respondis, kaj aldonis, ke ili ĝuus tie tiom da komforto kaj regalo, kiom ili povus trovi en Zaragoza mem. Ili deseliĝis, kaj Sancho prenis sian viktualion al ĉambro, kies ŝlosilon donis al li la gastejestro. Poste li gvidis la bestojn al la stalo, donis al ili ties porciojn de furaĝo, kaj revenis por vidi, kion novan don Quijote ordonus. La hidalgo sidis sur ŝtona benko, kaj Sancho dankis la ĉielon, ke lia mastro ne imagas kastelo ĉi gastejon. Venis la horo manĝi, ambaŭ retiriĝis al sia ĉambro, Sancho demandis al la gastejestro, kion li havas por surtabligo, kaj la alia respondis, ke iliaj deziroj estos tute plenumitaj kaj ke, sekve, ili mendu laŭvole, ĉar en lia domo ekzistas ĉio: birdoj el la aero, birdegoj el la kortoj kaj fiŝoj el la maro.

—Ni ne bezonas tiom —diris Sancho—. Ni havos sufiĉe per du rostitaj kokidoj, ĉar mia sinjoro estas delikata kaj apenaŭ manĝas, kaj mi ne tro glutemas.

La gastejestro respondis, ke li ne havas kokidojn, ĉar la milvoj ekstermis ilin ĉiujn.

—Se tiel, la sinjoro gastejestro ordonos rosti por ni molkarnan kokinon —diris Sancho.

—Kokinojn! Neeble! —respondis la gastejestro—. Hieraŭ mem mi sendis al la urbo, por vendo, pli ol kvindek da ili. Via moŝto petu ion ajn, sed ne kokinojn.

—Nu, bone —diris Sancho—. Viando bovidina aŭ kaprida certe ne mankos.

—Ĝuste nun mi ne havas en la domo, ĉar ili tute konsumiĝis. Sed la venontan semajnon, mi havos denove pli ol sufiĉe.

—Bele ni fartus, se ni devus atendi ĝis tiam! —respondis Sancho—. Sed mi vetus, ke ĉi mankon kompensas abundo de ovojn kaj lardo.

—Je Dio! —kriis la gastejestro—. Oni vidas, ke vi ŝatas ŝerci. Mi jam diris al vi ke mi ne havas kokinojn, kaj vi volas, ke mi havu ovojn! Pensu, se vi deziras, pri aliaj pladoj, sed ne petu frandaĵojn.

—Nu, homo, jam sufiĉas la divenado. Diru al mi, vere kaj efektive, kion vi havas, kaj ni finu ĉi aferon.

—Vere kaj efektive, sinjoro gasto, mi havas du piedojn bovajn, kiuj ŝajnas piedoj bovinidaj, aŭ, se vi preferas, bovinidajn piedojn, kiuj aspektas kiel bovaj: ili estas jam stufitaj, kun siaj kikero-grajnoj, siaj cepoj kaj sia lardo. Kaj ĝuste nun ili kvazaŭ diras: «Manĝu nin! Manĝu nin!».

—Jam rezervigu ilin al mi —diris Sancho—. Neniu ilin tuŝu. Mi pagos plej multe, ĉar nenio pli bongusta ekzistas en la mondo; kaj tute ne gravas, ĉu temas pri piedoj bovaj aŭ bovinidaj.

—Neniu tuŝos ilin —respondis la gastejestro—, ĉar la aliaj gastoj estas tiel alt-rangaj, ke ili vojaĝas kun propra kuiristo, provizisto kaj viktualio.

—Se paroli pri alt-rangaj —diris Sancho—, la pleja estas mia mastro. Sed lia profesio ne permesas al li la lukson porti proviziston kaj specialan viktualion. Ni kuŝiĝas meze de herbejo kaj ŝtopas nin per glanoj kaj mespiloj.

Tia estis la konversacio de Sancho kun la gastejestro, sed la ŝildisto ne volis ĝin daŭrigi, nek respondi lian demandon pri la ofico aŭ profesio de don Quijote. Alvenis do la manĝohoro, don Quijote retiriĝis al sia ĉambro, la gastejestro alportis al li la stufajon antaŭe menciitan, kaj la hidalgo volonte sidiĝis manĝi. Ŝajne en apuda ĉambro, apartigita disde la lia per minca muro, oni parolis, kaj don Quijote aŭdis:

—Je via vivo, don Jerónimo, ĝis oni alportos al ni la manĝon, ni legu ankoraŭ alian ĉapitron de la dua parto de *Don Quijote de La Mancha*.^[398]

Apenaŭ la hidalgo aŭdis sian nomon, li stariĝis kaj orelstreĉe komencis aŭskulti la konversacion. La menciita don Jerónimo respondis:

—Kial vi deziras, sinjoro don Juan, ke ni legu absurdojn? Kiu legis la unuan parton de la historio de don Quijote de La Mancha, ne povas legi kun plezuro ĉi duan.

—Tamen —diris don Juan— estus bone ĝin legi, ĉar ne ekzistas libro tiel mava, ke ĝi ne havas ion bonan. Sed, kio plej ĉagrenas min en ĉi dua parto estas, ke ĝi pentras la kavaliron jam senama al Dulcinea de El Toboso.

Aŭdinte tion, don Quijote, posedate de kolero kaj indigno, laŭte kriis:

—Se iu ajn aŭdacas aserti, ke don Quijote de La Mancha forgesis, aŭ povas forgesi Dulcinean de El Toboso, mi instruos lin per egalaj bataliloj, ke li tute trompiĝas!

Dulcinea ne povas esti forgesita, nek don Quijote kapablas forgesi: lia devizo estas konstanteco, kaj lia profesio nature kaj senpene gardi la ĵure donitan promeson.

—Kiu min respondas? —oni demandis de la alia ĉambro.

—Kiu, se ne don Quijote de La Mancha mem, kiu defendos kion li nun diras aŭ povos diri? Ĉar «bona paganto ne diskutas pri la kontoj» —respondis Sancho.

Apenaŭ Sancho tion diris, du kavaliroj —ili ŝajnis tio— eniris tra la pordo de lia ĉambro, kaj unu el ili, ĵetante la brakojn ĉirkaŭ la kolo de don Quijote, diris:

—Nek via aspekto povas dementi vian nomon, nek via nomo vian aspekton. Certe vi estas, sinjoro, la vera don Quijote de La Mancha, nordo kaj poluso de la vaganta kavalirismo, spite al la ulo, kiu volis uzurpi vian nomon kaj diskrediti viajn farojn: la aŭtoro de ĉi libro.

Li metis en la manojn de la hidalgo la libron, kiun portis kun si lia kompano, don Quijote ĝin foliumis senparole, kaj iom poste turnis sin al li dirante:

—Mi vidis ĝin tre supraĵe, tamen tri aferoj ŝajnas al mi riproĉindaj. Unue, kelkaj vortoj de la enkonduko;^[399] due, la aragonaj dialektaĵoj, ĉar la aŭtoro ne ĝuste uzas la artikolon; kaj trie, ke li montras sian nescion, ĉar li eraras, kaj devias de la vero koncerne la plej esencan punkton de la tuta historio, tial, ke li diras ĉi tie, ke la edzino de Sancho Panza, mia ŝildisto, nomiĝas Mari Gutiérrez,^[400] dum efektive ŝia nomo estas Teresa Panza. Kaj se la aŭtoro eraras en ĉi detalo tiel grava, oni povas timi, ke li eraras ankaŭ en la ceteraj punktoj de la historio.

—Grandioza historiisto, certe! —ironiis Sancho—. Bone informita li estas pri niaj aventuroj, se li donas al mia edzino

la nomon Mari Gutiérrez! Reprenu la libron, sinjoro, kaj vidu, ĉu mi aperas tie, kaj ĉu ankaŭ mian nomon oni ŝanĝis.

—Laŭ viaj vortoj, amiko —diris don Jerónimo—, sendube vi estas Sancho Panza, la ŝildisto de don Quijote.

—Jes, efektive —respondis Sancho—. Kaj mi fieras pri tio.

—Tiam mi ĵurus —aldonis la kavaliro—, ke ĉi moderna aŭtoro ne traktas vin honeste, male ol vi meritas. Li pentras vin glutema kaj stulta, sen ia spirito, t.e. tute diferenca de la Sancho priskribita en la unua parto de la historio de via mastro.

—Dio lin indulgu —diris Sancho—. Preferindus, se li estus lasinta min en mia angulo, sen memori pri mi, ĉar «kiu iras sperte, iras certe» kaj «bone sidas Sankta Petro en Romo».

La du kavaliroj petis la hidalgon akompani ilin manĝi en ilia ĉambro, ĉar ili sciis, ke en la gastejo ne ekzistas pladoj propraj al lia persono. Don Quijote, ĉiam ĝentila, cedis al ilia peto kaj manĝis kun ili. Sancho restis kiel absoluta mastro de la stufaĵo, sidiĝis ĉe la kapo de la tablo, kaj en la akompano de la gastejestro, kiu inklinis al la piedoj bovaj almenaŭ tiel multe kiel Sancho.

Dum la manĝado, don Juan demandis al don Quijote, ĉu li scias ion novan pri sinjorino Dulcinea de El Toboso: ĉu ŝi edziniĝis, gravediĝis aŭ akuŝis, aŭ ĉu ŝi konservas ankoraŭ sian virginecon kaj, gardante sian virton kaj pudoron, reciprokas la amajn pensojn de sinjoro don Quijote.

—Dulcinea estas ankoraŭ virga —respondis la hidalgo—. Mia amo pli firma ol iam antaŭe, kaj niaj rilatoj tiel sensukcesaj kiel kutime. Kaj ŝia belo transformiĝis en la mienon de kruda kampulino.

Poste don Quijote detale rakontis la ensorĉon de sinjorino Dulcinea de El Toboso, la eventojn en la kaverno de Montesinos, kaj la instrukciojn de la saĝulo Merlín, por ke oni ŝin elsorĉu per la sinskurĝado de Sancho.

La du kavalirojn ricevis grandan plezuron, aŭdante la hidalgon rakonti la strangajn aventurojn de sia historio, kaj ambaŭ miris tiel multe je liaj ekstravagancoj, kiel je lia eleganta stilo ilin rakonti. Kelkfoje ili opiniis lin prudenta, kelkfoje vidis lin gliti en absurdon, do ili ne sciis, kien meti lin inter la saĝo kaj la frenezo.

Sancho finis manĝi, lasis la gastejestron ebria kaj nekapabla teni sin sur siaj piedoj, direktis sin al la ĉambro de sia mastro, eniris kaj diris:

—Oni min pendumu, sinjoroj, se la aŭtoro de la libro, kiun vi havas, ne deziras malamiki al mi. Tamen mi esperas ke, kvankam li nomas min glutema, kiel via moŝto diras, li ne nomas min drinkulo.

—Nu, li vin nomas ankaŭ tio, kvankam mi ne memoras pri liaj precizaj vortoj —respondis don Jerónimo—. Sed certe li uzis aĉajn esprimojn, kaj krome, mensogajn, se juĝi laŭ la fizionomio de la bona Sancho ĉi tie staranta antaŭ mi.

—Viaj moŝtoj kredu min —diris Sancho—. La Sancho kaj la don Quijote de tiu historio tute certe ne estas la samaj aperantaj en la verko de Cide Hamete Benengeli, t.e. ni mem: mia mastro, kuraĝa, prudenta kaj amofrapita; kaj mi, simpla, sprita, kaj ne manĝ-avida aŭ ebriema.

—Mi vin kredas —respondis don Juan—, kaj, se eble, oni devus ordoni, ke neniu skribu pri la aferoj de la granda don Quijote, krom Cide Hamete, lia unua historiisto: ĝuste kiel Aleksandro dekretis, ke nur Apeles faru liajn portretojn.

—lu ajn portretu min, se li volas, sed ne min deformatu —diris don Quijote—. Ĉar la pacienco ofte eksplodas, kiam oni tro ŝarĝas ĝin per ofendoj.

—Nenian ofendon oni povus fari al don Quijote —diris don Juan— sen ke li facile venĝus, se li ne preferus oponi al ĝi per la ŝildo de sia pacienco, laŭŝajne forta kaj granda.

Tiel parolante ili pasigis grandan parton de la nokto. Don Juan deziris, por vidi la hidalgon fari novajn komentojn, ke li legu iom pli la libron. Sed don Quijote rifuzis, dirante, ke li konsideras ĝin tute legita, kaj ke li venis al la konkludo, ke la libro estas vera stultaĵo. Li aldonis, ke li ne volis, ke la aŭtoro ĝoju, pensante, ke don Quijote ĝin legis; ĉar oni devas deturni la penson de aferoj obscenaj kaj stultaj, des pli do la okulojn.

La du amikoj demandis lin, kien li decidis vojaĝi, kaj don Quijote respondis, ke li intencas iri al Zaragoza, por partopreni en la turniroj tie okazantaj ĉiujare kaj kie oni konkuras por armaĵo. Don Juan informis tiam la hidalgon, ke en la nova historio, don Quijote —aŭ kiu ajn li estas— jam partoprenis en turniro en Zaragoza, kaj ke la aŭtoro montris sin, en ĉi epizodo, stile plata, mizera en la priskriboj kaj manka de krea povo, sed riĉa je absurdoj.

—Se tiel do —respondis don Quijote—, mi ne metos la piedojn en Zaragoza. Tiamaniere mi pruvos antaŭ la tuta mondo la trompon de ĉi moderna historiisto, kaj la homoj vidos, ke mi ne estas la don Quijote, pri kiu li skribas.

—Vi ĝuste decidis —diris don Jerónimo—. Ankaŭ en Barcelona okazos turniroj, kie sinjoro don Quijote povus montri sian kuraĝon.

—Tion mi pensas fari —respondis don Quijote—. Kaj kun la permeso de viaj moŝtoj, mi retiros min, ĉar jam estas tempo

enlitiĝi. Bonvolu kalkuli min inter viaj plej bonaj amikoj kaj servistoj.

—Same min! —aldonis Sancho—. Mi povus iel utili al vi.

Don Quijote kaj Sancho retiris sin, kaj don Juan kaj don Jerónimo miris ĉe la mikso de saĝo kaj frenezo montrita de la hidalgo, kaj tute konvinkiĝis, ke ili vidis la verajn don Quijote kaj Sancho, ne la aliajn de la aragona aŭtoro.

Don Quijote frue leviĝis kaj, frapetante sur la muron de la apuda ĉambro, adiaŭis siajn novajn amikojn. Sancho riĉe pagis la gastejstron kaj konsilis lin, aŭ ne tiel multe vantigi pri la provizoj de sia domo, aŭ teni ĝin pli bone provizita.

[397] Hispana vorto: ajna nutraĵo, kiam manĝata kun multe da pano.

[398] Ĉi tie la aŭtoro komencas siajn aludojn al la verko kaj al la persono de Avellaneda, kiu plagiatis la rolulojn de Cervantes kaj, antaŭ ol li, publikigis daŭrigan parton al la unua *Don Quijote*.

[399] Eble la vortoj priskribantaj Cervantes kiel oldan, kriplan kaj envian.

[400] Ĉi-rilate Avellaneda ne mensogas, ĉar Cervantes donis al ŝi la diritan nomon en la ĉapitro 7-a de la unua parto.

Ĉapitro 60

Pri la aventuro de don Quijote sur la vojo al Barcelona

La freŝo de la mateno aŭguris, ke same freŝa estus la tago, kiam don Quijote elrajdis el la gastejo, informinte sin unue pri la vojo plej rekta por iri al Barcelona sen pasi tra Zaragoza: ĝis tia grado li deziris pruvi la falson de la nova historio, kies aŭtoro laŭdire forte kalumniis lin. Nu, dum pli ol ses tagoj okazis al li nenio registrinda, sed ĉe la fino de la dirita tempo, li deviis de la vojo, kaj la nokto ilin surprizis en densa bosko el kverkoj aŭ kork-arboj, ĉar ĉi-rilate Cide Hamete ne observas sian kutiman precizon. La mastro kaj la servisto deseliĝis, kaj Sancho, kiu manĝis tiun tagon, aranĝis sin kontraŭ la trunkon de arbo kaj baldaŭ falis en la brakojn de la dormo. Sed don Quijote, kies senlaca fantazio, ne la malsato, tenis lin sendorma, ne povis fermi la okulojn, kaj lasis sian penson vagadi al mil diversaj lokoj: foje li imagis sin en la kaverno de Montesinos; foje li vidis Dulcinean, transformitan en kampulinon, salti sur sian azenon; foje sonis al li en la oreloj la vortoj de la saĝulo Merlín rilate al la kondiĉoj kaj rimedoj necesaj por la elsorĉo de Dulcinea. Kaj li desperis ĉe la neglekto kaj manko de karitato de Sancho, konvinkite, ke la ŝildisto donis al si nur kvin batojn, nombron mizeran kompare kun la infinita kvanto de la ceteraj ankoraŭ ŝuldataj. Kaj ĉi penso tiel ĉagrenis kaj indignigis lin, ke li diris en si:

—Se la granda Aleksandro distranĉis la gordian nodon, dirante: «la saman rezulton donas tranĉi aŭ deligi», kaj malgraŭe li fariĝis universala sinjoro de la tuta Azio, mi atingos la samon rilate al la elsorĉo de Dulcinea, se mi

skurĝos Sanchon kontraŭ lia volo: ĉar, se la solvo de ĉi afero dependas de tio, ke li ricevu la tri mil kaj kelkajn vergojn: kio gravas, ĉu li ricevas ilin per si mem aŭ per alia persono?

Kun ĉi ideo li prenis la bridon de Rocinante, aranĝis ĝin, por ĝin uzi kiel vipon, kaj komencis denodi la laĉojn de la kuloto de Sancho (kvankam oni kredas, ke li havis nur unu frontan laĉon kiel unikan alligilon). Sed apenaŭ la hidalgo tuŝis lin, Sancho subite kaj plene vekigis kaj diris:

—Kio okazas? Kiu tuŝas kaj delaĉas min?

—Mi mem —respondis don Quijote—. Mi venas ripari vian forgeson kaj mildigi la premon de miaj zorgoj. Mi venas vipi vin, Sancho, kaj igi vin parte pagi vian ŝuldon. Dulcinea pereas, vi vivas senĝene, kaj mi mortas de senpacienco. Tiel do, propravole malsuprentiru vian kuloton, ĉar mi intencas skurĝi vin, en ĉi soleco, almenaŭ du mil fojojn.

—Ho ne! —kriis Sancho—. Estu kvieta, sinjoro, aŭ mi ĵuras je Dio, ke la surdaj nin aŭdos. Mi devontigis min al propravola sinkurĝado, ne al trudataj vergoj, kaj nun mi ne emas bati min! Sufiĉu, ke mi donas al vi mian vorton tani kaj draŝi al mi la haŭton, kiam mi deziras tion fari.

—Mi ne povas lasi ĉi aferon al via bontrovo, Sancho —respondis don Quijote—, ĉar vi havas duran koron kaj, kvankam kampulo, molan karnon.

Tiel parolante, don Quijote klopodis kaj penis delaĉi lin. Tiam Sancho stariĝis, ĵetis sin kontraŭ sian mastron, forte ĉirkaŭpremis, krur-falĉis kaj renversis lin, kaj per siaj manoj tenis tiamaniere la liajn, ke la hidalgo kuŝis senmova kaj preskaŭ senspira. Don Quijote fine povis diri:

—Nu, perfida, ĉu vi ribelas kontraŭ via mastro kaj natura sinjoro? Ĉu vi aŭdacas ataki vian pan-donanton?

—Mi ne faligas nek surtronigas reĝon^[401] —respondis Sancho—, sed helpas min mem, kiu estas mia sinjoro. Via moŝto promesu lasi min trankvila kaj ne vipi min nun, kaj mi lasos vin libera. Se ne

Mortu, perfidul' ĉi tie,
malamik' de doña Sancha.^[402]

Don Quijote tion promesis kaj ĵuris je sia vivo tuŝi al li eĉ ne unu fadenon de lia vesto kaj lasi lin libera skurĝi sin laŭ sia volo, plaĉo kaj bontrovo.

Leviĝis Sancho kaj iris kelkan distancon, sed, ĝuste kiam li intencis apogi sin kontraŭ alian arbon, li sentis, ke io tuŝas lian kapon. Li levis la manon, trafis du homajn piedojn kun ties ŝtrumpoj kaj ŝuoj, tremis de timo, iris al alia arbo, kaj okazis same. Tiam li kriis, petante helpon, al don Quijote. La hidalgo alvenis al li, demandis, kio okazas kaj kio lin teruras, kaj Sancho respondis, ke la arboj, ĉirkaŭe, plenas de homaj piedoj kaj kruroj. Don Quijote palpis ilin, tuj suspektis, pri kio temas, kaj diris al Sancho:

—Ne ekzistas motivo por timi, ĉar ĉi piedoj kaj kruroj, palpeblaj, sed ne videblaj ankoraŭ, sendube apartenas al banditoj kaj latronoj pendumitaj ĉi tie. La justico kutime pendumas ilin en ĉi lokoj, ofte en grupoj de dudek aŭ tridek; kaj el tio mi konkludas, ke ni certe troviĝas proksime al Barcelona.^[403]

Kaj efektive li pravis. Ĉe la mateniĝo ili levis la rigardon kaj vidis la arbojn kun ties grapoloj da banditaj kadavroj, kaj, se ilin alarmis la mortintaj banditoj, ne malpli teruris ilin la apero de pli ol kvardek banditoj vivantaj, kiuj subite ĉirkaŭis ilin kaj ordonis ilin, en la kataluna lingvo, resti senmovaj ĝis la alveno de ilia kapitano. Don Quijote trovis sin piede, kun la ĉevalo sen brido, kun sia lanco apogita al arbo, unuvorte,

tute sendefenda. Tiel do, li decidis kruci la manojn, klini la kapon kaj rezervi sin por pli bona okazo.

La banditoj tuj sin ĵetis al la azeno, traserĉis ĝin, kaj poste prirastis, ĝis la lasta ereto, la dusakon kaj la ŝarĝo-selon. Bonŝance Sancho portis la eskudojn de la duko, kun sia propra mono, kaŝitaj en subvesta zono; tamen la grupo de bonuloj certe trakardus lin, kaj eĉ rigardus, ĉu io rabinda kuŝas inter liaj haŭto kaj karno, se en tiu momento ne alvenus ilia kapitano, viro fortika, proksimume tridek-kvarjara, bruna, kun pli ol meza staturo kaj severa aspekto, Li rajdis sur forta ĉevalo, portis maŝ-kuton, kaj, sur la korpoflankoj, kvar pistolojn el la nomataj silik-arkebuzetoj. Li rimarkis, ke liaj ŝildistoj (tian nomon ricevas la viroj okupataj en la bandita profesio) pretas nudigi Sanchon, li ordonis ilin halti, la banditoj tuj obeis, kaj dank' al tio saviĝis la zono de Sancho. La kapitano miris, vidante lancon apogitan al arbo, ŝildon sur la tero kaj la hidalgon en armaĵo, profunde en pensoj kaj kun la plej trista kaj melankolia figuro imagebla. La kapitano do proksimiĝis al li kaj diris:

—Ne afliktiĝu, amiko. Vi falis, ne en la manojn de ia kruela Osiris,^[404] sed de Roque Guinart,^[405] kiu estas pli kompatema ol rigora.

—Mia afliktiĝo —respondis don Quijote— venas, ne de tio, ke mi falis sub vian povon, ho kuraĝa Roque, kies famo transiras ĉian limon de la mondo!, sed de la fakto, ke viaj soldatoj kaptis min pro mia nesingardo ne havi la ĉevalon preta, kvankam la ordeno de la vaganta kavalirismo, kies membro mi estas, devigas min ĉiam teniĝi garde, kiel sentinelo de mi mem. Ĉar vi devas scii, ho granda Roque!, ke, se ili trovus min sur mia ĉevalo, kun mia lanco kaj kun mia ŝildo, ne tre facile ili venkus min, tial, ke mi estas don Quijote de La Mancha, kies prodaĵoj famas en la tuta universo.

Roque Guinart tuj komprenis, ke la malsano de don Quijote havas pli da frenezo ol da kuraĝo. Li jam antaŭe aŭdis pri la hidalgo, sed neniam kredis liajn farojn veraj, nek imagis ebla la ekziston de homa spirito regata de tia humoro. Sed li tre ĝojis pro la renkonto, ĉar li povus vidi de proksime kion li ie kaj tie aŭdis pri la hidalgo. Tiel do, li diris:

—Kuraĝa kavaliro, ne ĉagreniĝu, nek opiniu missorta vian nunan staton. Povus okazi, ke per ĉi stumbloj rektiĝus via tordita destino, se konsideri, ke la ĉielo, plej strange kaj neimageble, ofte levas la falintajn kaj riĉigas la paŭperajn.

Don Quijote pretis danki lin, kiam, ĉe ilia dorso, aŭdigis bruo de, ŝajne, pluraj ĉevaloj. Sed temis pri nur unu, kaj rajde sur ĝi galope alimpetis junulo proksimume dudek-jara, en kostumo el verda damasko kun oraj pasamentoj, kun ĉapelo plumo-garnita laŭ la Valona stilo, botoj ciritaj kaj striktaj, dago, glavo kaj spronoj orumitaj, eta pafilo en la manoj, kaj du pistoloj sur siaj flankoj.

Ĉe la bruo, Roque turnis la kapon kaj vidis tiun belan figuron. Kaj la rajdanto, alveninte, diris:

—Mi venas renkonti vin, ho kuraĝa Roque!, por trovi ĉe vi, se ne la trankvilon, almenaŭ ian mildigon al mia aflikto. Kaj por ne teni vin perpleksa, ĉar mi scias, ke vi ne konas min, mi vin informas, ke mi estas Claudia Jerónima, filino de Simón Forte, via bona amiko kaj persona malamiko de Clauquet Torrellas, kiu, de sia flanko, malamikas al vi, ĉar li apartenas al la bando kontraŭa al la via. Vi scias, ke ĉi Torrellas havas filon nomatan don Vicente Torrellas, aŭ almenaŭ tiel li nomiĝis ĝis antaŭ du horoj. Nu, por koncize diri la rakonton de mia misfortuno, sciu, ke li kaŭzis ĝin: li vidis kaj amindumis min; mi aŭskultis lin kaj enamiĝis al li, sen la scio de mia patro: ĉar ne ekzistas virino, eĉ plej gardata, kiu ne havus tempon doni sin al la impeto de siaj deziroj. Nu, li

promesis edziĝi al mi, kaj mi donis al li mian parolon, ke mi estus lia, sed ni ne pasis de la vortoj al la agoj. Hieraŭ mi eksciis, ke li, forgesinte sian promeson, decidis edziĝi al alia, kaj ke la ceremonio okazus ĉi-matene. La sciigo min konsternis, kaj mi tute perdis la kapon. Kaj tial, ke mia patro forestis de la vilaĝo, mi povis surmeti ĉi viran kostumon kaj, spronante la ĉevalon, atingis don Vicente proksimume tri mejlojn for de ĉi tie. Sen halti por riproĉi lin aŭ por aŭskulti liajn ekskuzojn, mi alpafis lin per ĉi pafilo kaj krome per ĉi du pistoloj; mi kredas, ke almenaŭ du kugloj penetris lian korpon, kaj per la sango de liaj vundoj mi venĝis mian honoron. Mi lasis lin tie, inter liaj servistoj, kiuj ne kuraĝis nek povis lin defendi. Mi venis vin renkonti, ĉar mi deziras, ke vi konduku min al Francio, kie mi povos loĝi ĉe kelkaj parencoj miaj. Mi suplikas vin ankaŭ, ke vi defendu mian patron, por ke la multaj familianoj de don Vicente ne kuraĝu fari kontraŭ li kruelan venĝon.

Roque, impresata de la rakonto, de la kuraĝo, de la energio, de la eleganto kaj de la bela figuro de la ĉarma Claudia, diris:

—Nu, sinjorino, ni iru vidi, ĉu via malamiko mortis. Poste, ni vidos, kion bonan mi povos fari por vi.

Sed don Quijote, atente aŭskultinte la historion de Claudia kaj la respondon de Guinart, diris:

—Neniu bezonas defendi ĉi sinjorinon, ĉar mi mem surprenos tian taskon. Redonu al mi la ĉevalon kaj la armojn kaj atendu min ĉi tie: mi renkontos ĉi kavaliron kaj devigos lin, mortan aŭ vivan, plenumi sian devon rilate al tiel granda belulino.

—Oni ne dubu kion li diras —rekomendis Sancho—. Mia mastro havas grandan talenton kiel svatisto: antaŭ nelonge,

li devigis edziĝi alian viron, ĉar li same rifuzis plenumi sian parolon donitan al pucelo: kaj se ne intervenus la sorĉistoj, kiu transformis lian veran figuron en lakean, nuntempe la menciita pucelo jam estus perdinta sian pucelecon.

Roque, pli inklina atenti la aferon de la bela Claudia ol la vortojn de don Quijote kaj Sancho, ignoris ilin, kaj ordonis al siaj ŝildistoj redoni al Sancho ĉion, kion ili prenis de la azeno, kaj ankaŭ, ke ili retiru sin al la loko, kie ili pasigis la antaŭan nokton. Tuj poste li forrajdis kun Claudia serĉi la vunditan aŭ mortan don Vicente. Ili alvenis al la loko, kie Claudia pli frue atingis lin, kaj ili trovis nur iom da freŝe verŝita sango. Sed, ĉirkaŭen rigardante, ili distingis grupon sur deklivo de monto, kaj trafe pensis, ke tie la servistoj de don Vicente portas lin, vivan aŭ mortan, por flegi aŭ enterigi lin. Ili rapidis post la grupon, kaj tial, ke ĝi lante marŝis, baldaŭ ili ĝin atingis. Ili trovis don Vicente en la brakoj de liaj servistoj, kaj li suplikis kun laca kaj vea voĉo, ke oni lin lasu morti tie, ĉar pro la doloro de liaj vundoj ne valoras la penon plu iri. Claudia kaj Roque desaltis de sur la ĉevaloj, alkuris al li, la servistoj timis la ĉeeston de Roque, kaj Claudia embarasiĝis, vidante la vunditan don Vicente. Kun sia animo baraktanta inter la indigno kaj la kompatato, Claudia proksimiĝis al li, prenis liajn manojn kaj diris:

—Se vi donintus al mi ĉi manojn konforme al nia interkonsento, vi ne vidus vin en via nuna stato.

La vundita kavaliro apertis la duonfermitajn okulojn, rekonis Claudian kaj respondis:

—Mi bone vidas, bela kaj trompita sinjorino, ke vi donis al mi la morton, sen ia kulpo de mia flanko, ĉar neniam mi ofendis vin per pensoj aŭ per agoj.

—Ĉu ne veras, do, ke ĉi-matene vi devus edziĝi al Leonora, filino de la riĉa Balvastro?

—Ne, tute ne —respondis don Vicente—. Sendube mia fatala sorto alportis al vi tian sciigon por ke, puŝate de la ĵaluzo, vi prenu de mi la vivon. Sed tial, ke mi ĝin lasas en viaj manoj kaj brakoj, mi konsideras min bonsorta. Kaj por ke vi vidu, ke mi diras la veron, premu al mi la manon kaj ricevu min kiel edzon, se vi volas. Mi ne povus doni al vi alian kontentigon por kompensi la ofendon, kiun, laŭ via opinio, mi faris al vi.

Claudia premis al li la manon, kaj siatempe ŝia koro tiel tordiĝis, ke ŝi svenis sur la sangon kaj bruston de don Vicente, dum morta spasma posedis lin.

Roque, perpleksa, ne sciis kion fari. La servistoj kuris alporti akvon kaj ĵetis ĝin al ili sur la vizaĝon. Claudia rekonsciiĝis el sia sveno, sed ne el sia spasma don Vicente, ĉar li ne plu vivis. Claudia, vidante, ke lia kara edzo konvulsiis en la morton, ŝiris la aeron per lamentoj, vundis la ĉielon per plendoj, taŭzis al si la harojn, lasis ilin liberaj al la vento, gratis al si la vizaĝon per siaj propraj ungoj, montris ĉian signon de doloro kaj despero imageblan en vundita koro.

—Ho, kruela kaj stulta virino! —ŝi sin riproĉis—. Kiel senpripense vi movis vin por efektiviĝi tiel mavan ideon! Ho, rabia forto de la ĵaluzo, kian desperan finon vi rezervas al la personoj, kiuj ricevas vin en sian bruston! Ho, kara edzo, kies fatala sorto kondukis vin, pro mia kulpo, de la nuptolito al la tombo!

La lamentoj de Claudia estis tiel multaj kaj tristaj, ke ili igis larmi la okulojn de Roque, kvankam li nenial kutimis plori.

Ploris la servistoj, svenis Claudia ĉiumomente, kaj la tuta loko ŝajnis kampo de aflikto kaj regiono de misfortuno. Fine Roque Guinart ordonis la servistojn de don Vicente porti lian

kadavron al la proksime staranta vilaĝo de lia patro, por ke oni lin enterigu tie. Claudia diris al Roque, ke ŝi deziras retiriĝi en monaĥinejon, kies abatino estas onklino ŝia, kaj ke ŝi havas la intencon atendi tie la morton, akompanate de alia edzo pli bona kaj eterna. Roque laŭdis ŝian pian decidon, sin proponis akompani ŝin, kien ajn ŝi volus, kaj promesis defendi ŝian patron kontraŭ la familianoj de don Vicente kaj eĉ kontraŭ la tuta mondo, se necese. Claudia tute ne akceptis lian akompanion, sed dankis al li lian proponon per la plej bonaj vortoj, kiujn ŝi povis trovi, kaj kun larmoplenaj okuloj adiaŭis lin. La servistoj de don Vicente levis la kadavron, kaj Roque reiris al sia bando. Kaj tiel finiĝis la am-afero de Claudia Jerónima: sed, kion alian atendi, se konsideri, ke la nevenkebla kaj kruela forto de la ĵaluzo teksis la kanvason de ŝia lamentinda historio?

Roque Guinart renkontis siajn ŝildistojn en la loko, kie, laŭ liaj ordonoj, ili atendis. Kaj meze de la grupo, don Quijote, sur Rocinante, paroladis rekomendante ilin forlasi sian vivmanieron, tiel danĝeran al la korpo kiel al la animo. Sed tial, ke la pliparto estis el Gaskonio, homoj rustikaj kaj sen principoj, la prediko de la hidalgo faris al ili nenian impreson. Roque demandis al Sancho Panza, ĉu oni jam redonis al li ĉion valoran, kion liaj ŝildistoj prenis de la azeno. Sancho respondis jese, kaj aldonis, ke nur mankas tri poŝtukoj, tiel valoraj kiel tri urboj.

—Kion vi diras, homo? —protestis unu el la banditoj—. Mi havas la poŝtukojn, kaj ili valoras eĉ ne tri realojn.

—Vi pravas —diris don Quijote—. Sed mia ŝildisto alte taksas ilin, konsiderante la personon, kiu ilin donis al mi.

Roque Guinart ordonis la tujan redonon de la poŝtukoj, poste komandis siajn virojn formi linion, kaj ke oni metu antaŭ ili ĉion, kion ili rabis de post la lasta distribuado, inkluzive de

vestoj, juveloj kaj mono. Tuj sekve li faris rapidan inventaron, kalkulis la prezon en mono de la artikoloj nedivideblaj, kaj distribuis la tuton inter la membroj de sia bando kun tiel granda egaleco kaj prudento, ke li ne ignoris, eĉ per unu joto, la plej striktajn regulojn de la distribua justo.

Post ol la disdono lasis ĉiujn kontentaj kaj pagitaj, Roque diris al don Quijote:

—Se mi ne traktus ilin kun la plej granda senpartieco, ne eblus vivi kun ili.

—La justeco certe estas tre bona afero —rimarkis Sancho—, tial, ke eĉ inter la rabistoj oni ĝin uzas.

Unu bandito aŭdis lin, svingis super li la kolbon de arkebuzo kaj sendube frakusus lian kapon, se Roque Guinart ne krius al li, ke li haltu. Sancho terurigis kaj decidis en si ne aperti refoje la buŝon dum lia cetera restado inter tiaj uloj. Ĉe tio alvenis unu aŭ pluraj el la ŝildistoj postenigitaj kiel sentineloj ĉe la vojoj por observi la cirkuladon de vojaĝantoj kaj teni informita sian ĉefon pri ĉio okazanta, kaj diris al li:

—Sinjoro, ne for de ĉi tie, sur la vojo al Barcelona venas granda nombro da homoj.

—Ĉu personoj nin serĉantaj, aŭ personoj serĉataj de ni? —demandis Roque.

—Personoj de ni serĉataj.

—Tiel do, vi ĉiuj iru kapti ilin —ordonis Roque—. Kaj zorgu, ke eĉ ne unu el ili eskapu.

La banditoj obeis, kaj don Quijote, Sancho kaj Roque restis solaj, atendante la revenon de la ŝildistoj, kaj kian predon ili

alportos. Dume Roque diris al don Quijote:

—Ĉi vivo nia, sinjoro don Quijote, certe ŝajnas al vi stranga: strangaj aventuroj, strangaj incidentoj ĉiam danĝeraj. Kaj mi ne miras, ke tia ŝajnas al vi nia vivo, ĉar mi konfesas, ke, vere, ne troveblas ekzistado pli agitata kaj plena de alarmoj ol la nia. Min trenis al ĉi vivo revenĝa sento, kapabla perturbi per sia forto eĉ la plej pac-aman koron. Mi havas kompateman kaj bon-intencan naturon, sed, kiel dirite, la deziro venĝi min kontraŭ ofendo al mia familio tiel superregas la bonon de miaj inklinoj, ke mi persistas en ĉi situacio, spite al mia konscienco. Kaj same kiel abismo vokas abismon,^[406] kaj peko pekon, tiel mi forĝis, eron post ero, daŭran ĉenon el venĝoj, ĉar mi ŝarĝis min, ne nur per la miaj, sed ankaŭ per la venĝoj de aliaj personoj. Sed dank' al Dio, mi ne perdas la esperon trafi en sekuran havenon, eĉ se mi vidas min meze de la labirinto de miaj eraroj.

Don Quijote miris, aŭdante Roque paroli tiel saĝe kaj prave, ĉar li imagis, ke inter rabistoj, murdistoj kaj latronoj, oni ne povus trovi homon kapablan esprimi sin tiamaniere.

—Sinjoro Roque —li respondis—, la komenco de la sano kuŝas en tio, koni la malsanon kaj konsenti preni la medikamenton preskribitan de la kuracisto. Via moŝto malsanas, sed konas vian afekcion, kaj la ĉielo, aŭ pli ĝuste, Dio, t.e. nia kuracisto, uzos la ĝustan medikamenton por resanigi vin; ordinare ĝi efikas iom post iom, ne subite kaj mirakle. Krome, la pekuloj inteligentaj resaniĝas pli facile ol la stultaj, kaj tial, ke vi montris ĵus vian saĝon per viaj vortoj, vi devas nur ne perdi la kuraĝon, kaj atendi, ke la malsano de via konscienco mildiĝu. Kaj se via moŝto deziras redukti la longon de via vojo kaj facile paŝi sur la padon de via saviĝo, venu kun mi, kaj mi instruos al vi la profesion de la vaganta kavalirismo, kie vi trovos tiom da penigaj laboroj kaj

misfortunoj, ke, se konsiderataj kiel pentofaroj, ili kondukos vin al la ĉielo en la daŭro de palpebrumo.

Roque ridis je la konsilo de don Quijote; poste, ŝanĝinte la temon de la konversacio, li rakontis la tragikan aventuron de Claudia Jerónima, kaj ĉe tio Sancho tre afliktiĝis, ĉar lin ĉarmis la belo, la spirito kaj la kuraĝo de la knabino. Tiam alvenis la ŝildistoj de Guinart kun sia predo: du surĉevalaj kavaliroj, du piediraj pilgrimantoj kaj kaleŝon plenan de virinoj kun eskorto de ses servistoj rajdaj aŭ surpiedaj, kaj du mulistoj je la servo de ambaŭ kavaliroj. La ŝildistoj tenis sin garde ĉirkaŭ la grupo, kaj venkitoj kaj venkintoj absolute silentis, atendente, ke la granda Roque Guinart parolu. Fine li demandis al la kavaliroj, kiuj ili estas, kien ili iras, kaj kiom da mono ili portas kun si.

—Sinjoro —respondis unu el la du— ni estas kapitanoj de la hispana infanterio. Niaj kompanioj kantonmentas en Napolo, kaj ni iras enŝipiĝi en unu el la kvar galeroj laŭdire troviĝantaj en la haveno de Barcelona, por navigi de tie al Sicilio. Ni portas ducent aŭ tricent eskudojn, kaj kun ili ni kredas nin riĉaj, ĉar la mizero propra al ni, soldatoj, ne permesas, ke ni havu pli grandan trezoron.

Roque demandis al la pilgrimantoj same, kiel al la kapitanoj, kaj ili respondis, ke ili iras enŝipiĝi por vojaĝi al Romo, kaj ke, entute, ili portas kun si proksimume sesdek realojn. Li volis scii ankaŭ, kiuj veturas en la kaleŝo kaj kien, kaj kiom da mono ili portas. Unu el la rajdaj servistoj respondis:

—Mia sinjorino, doña Guiomar de Quiñones, edzino de la prezidanto de la tribunalo de Napolo, kun unu filineto sia, unu ĉambristino kaj unu duenjo veturas en ĉi kaleŝo; ni, ses servistoj, akompanas ilin, kaj nia mono estas sescent eskudoj.

—Tiel do —diris Roque Guinart— ni jam havas ĉi tie naŭcent eskudojn kaj sesdek realojn. Miaj soldatoj estas proksimume sesdek. Do ili mem kalkulu kiom da mono ĉiu devas ricevi, ĉar mi ne estas forta en nombroj.

Aŭdinte tion, la latronoj levis la voĉon, kriante:

—Longe vivu Roque Guinart, malgraŭ la friponoj, kiuj volas pereigi lin!

La kapitanoj afliktiĝis, la sinjorino prezidant-edzino faris tristan vizaĝon kaj la pilgrimantoj tute ne ĝojis ĉe la anoncita konfisko de ilia mono. Roque tenis ilin iom da tempo en ĉi suspenso, sed li ne volis plilongigi ilian suferon, videblan de la distanco de arkebuza paf-atingo, kaj turnante sin al la kapitanoj, diris:

—Viaj moŝtoj, sinjoroj kapitanoj, bonvolu prunti al mi sesdek eskudojn, kaj la sinjorino prezidant-edzino okdek por kontentigi ĉi skadron, kiu min akompanas, ĉar «la abato kantas, kie li manĝas».^[407] Poste vi povos libere kaj neĝenate sekvi vian vojon: mi donos al vi paspermeson, kaj se vi renkontos alian el miaj bandoj, dise postenigitaj en ĉi regiono, nenian damaĝon vi ricevos. Mi ne havas la intencon mistrakti soldatojn aŭ virinojn, des malpli virinojn de alta rango.

La kapitanoj longe kaj elokvente dankis al Roque Guinart pro lia ĝentila kaj larĝ-anima konduto: ili trovis ĝin tia, konsiderante, ke li ne prenis de ili ties tutan monon. Sinjorino doña Guiomar de Quiñones volis salti de la veturilo por kisi la manojn kaj la piedojn de la granda Roque, sed li tute ne konsentis. Kontraŭe, li petis, ke ŝi pardonu lin pro la ofendo al ŝi farita kaŭze de la postuloj de lia perversa ofico. La prezidant-edzino ordonis al servisto sia tuj transdoni la okdek eskudojn, je kiuj oni taksis ŝian kontribucion. La

kapitanoj jam pagis siajn sesdek eskudojn, kaj la pilgrimantoj pretis elpoŝigi sian mizeran burson. Sed Roque petis ilin esti trankvilaj, turnis sin al siaj ŝildistoj kaj diris:

—El ĉi sumo rezultas du eskudoj por ĉiu el vi, kaj restas ankoraŭ dudek eskudoj. Oni donu dek al ĉi pilgrimantoj, kaj la aliaj dek al ĉi bona ŝildisto,^[408] por ke li parolu bonon pri ĉi aventuro.

Poste, Roque petis sian skribilaron, kiun li ĉiam portis kun si, skribis kaj donis al la vojaĝantoj paspermeson por la ĉefoj de siaj bandoj, adiaŭis ilin kaj lasis ilin liberaj kaj mirigitaj de lia noblo, lia ĝentilo kaj lia stranga konduto. Ili eĉ pensis, ke Roque estas, ne ia konata latrono, sed speco de Aleksandro la Granda. Unu el liaj ŝildistoj komentis en sia lingvo duone gaskona, duone kataluna:

—Ĉi kapitano pli ŝajnas monaĥo ol bandito. Sed de nun, se li volas montri sin donacema, tion li faru per sia mono, ne per la mia.

La kompatinda ulo parolis ne sufiĉe softe, kaj liaj vortoj trafis la orelon de Roque, kiu elingis sian glavon kaj fendis preskaŭ en du partojn lian kapon, dirante:

—Tiamaniere mi punas la longa-langajn kaj la ribelemajn.

Ĉiuj konsterniĝis, kaj eĉ ne unu aŭdacis diri unu solan vorton: tiel granda estis la aŭtoritato de Roque super la bando.

Poste li iom apartiĝis kaj skribis leteron al amiko sia en Barcelona, informante lin, ke li havas kun si la faman don Quijote de La Mancha, la vagantan kavaliron, pri kiu oni rakontis tiom da aferoj; ke la hidalgo estas la plej simpatia kaj klera homo de la mondo, kaj ke post kvar tagoj, t.e. en la tago de Sankta Johano Baptisto, la hidalgo prezentiĝos meze

de la plaĝo de la urbo en sia armaĵo kaj kun siaj bataliloj, sur sia ĉevalo Rocinante kaj kun sia ŝildisto Sancho sur ties azeno. Roque aldonis, ke li sciigu pri la afero al iliaj komunaj amikoj Niarros, por ke ankaŭ ili partoprenu en la amuziĝo, kaj ke li preferus, ke liaj malamikoj Cadells ne estu informitaj, por ke ili ne ĝuu la renkonton kun don Quijote, kvankam tio estus neebla, ĉar la konduto samtempe ekstravaganca kaj saĝa de don Quijote kaj la drolaĵoj de lia ŝildisto Sancho Panza ne povus ne diskoniĝi kaj amuzi la tutan mondon. Roque sendis ĉi leteron per unu el siaj ŝildistoj, kiu, anstataŭiginte sian banditan kostumon per alia kampula, alvenis al Barcelona kaj transdonis la mesaĝon al la indikita persono.

[401] Sancho mencias faman frazon el la hispana historio de la 14-a jarcento. Luktante la reĝo don Pedro la Kruela kontraŭ sia frato, kaj aspiranto al la trono, don Enrique, en la tendo de Beltrán Duguesclín, franca kapitano veninta helpi per siaj trupoj al don Enrique, ambaŭ falis teren, don Enrique sub sia frato. Tiam Beltrán intervenis, puŝante ilin en inversan pozicion, kaj dirante: «Mi ne faligas, nek surtronigas reĝon, sed helpas mian sinjoron».

[402] Sancho citas alude du versojn de olda romano.

[403] En la epoko de Cervantes tre abundis latronoj kaj rabistoj en Katalunio. De tio venas la komento de don Quijote.

[404] Misprononco por Busiris, reĝo de Egiptujo, kiun, laŭ la mitologio, mortigis Herkulo.

[405] Fama bandito, kiu fakte vivis en la tempoj de Cervantes.

[406] El la Biblio (Psalmaro 42,7).

[407] Hispana proverbo: kie oni ne ricevas pagon, oni ne laboras.

[408] Al Sancho, kiel legiĝas en la sekvanta ĉapitro.

Ĉapitro 61

Pri tio okazinta al don Quijote en ties eniro en Barcelonan kun aliaj aferoj pli veraj ol saĝaj

Dum tri tagoj kaj tri noktoj restis don Quijote kun Roque, kaj, eĉ se li restus dum tricent jaroj, li ĉiam trovus en lia vivmaniero nombron da aferoj indaj je rimarko kaj admiro. La banditoj leviĝis ĉe la frumateno en unu loko kaj manĝis en alia; kelkfoje forkuris, sen scii de kiu, kaj kelkfoje atendis, sen scii kiun; dormis piede kaj interrompis sian dormon por marŝi de ie ien. Ilia vivo konsistis en tio, postenigi sentinelojn, aŭskulti spionojn, blovi la meĉojn de la arkebuzoj kvankam ili havis etan nombron de tiaj armoj, kaj uzis preskaŭ nur musketojn. Roque tranoktis diste de siaj ŝildistoj, sen ke ili scius kie, ĉar la multaj proklamoj de la vicreĝo de Barcelona promesantaj monan rekompencan por lia kapo, tenis lin en konstantaj zorgo kaj alarmo. Li fidis je neniu, kaj eĉ timis, ke liaj propraj subuloj mortigus lin aŭ lin transdonus al la justico: vivo certe mizera kaj angora.

Fine, sur neuzataj vojoj, krutaj padoj kaj sekretaj pasejoj, Roque, don Quijote kaj Sancho iris kun ses banditoj ale al Barcelona, kaj en la antaŭtago de la festo de Sankta Johano, en nokta horo, alvenis al la plaĝo de la urbo. Roque brakumis la hidalgon kaj Sanchon, donis al ĉi lasta la dek eskudojn promesitajn, sed ĝis tiam ne liveritajn, interŝanĝis kun ili milon da komplimentoj, adiaŭis kaj foriris, kaj don Quijote restis sola, atendente sur la ĉevalo la alvenon de la mateno. Iom poste, la vizaĝo de la blanka aŭroro komencis montriĝi tra la balkonoj de oriento, ĉe la ĝojo de herboj kaj floroj, sed ne de la aŭdo. Tamen en la sama momento karesis la orelon ne nur la sono de nekalkuleblaj klarnetoj, tamburoj

kaj tintiloj, sed ankaŭ la voĉoj de homoj surĉevalaj, kiuj kriis: «Pason, pason al ni!» kaj ŝajne alkuris de la urbo.

La aŭroro cedis al la suno, kies vizaĝo, pli granda ol ronda ŝildo pro sia proksimo al la horizonto, iom post iom leviĝis. Don Quijote kaj Sancho etendis ĉien la rigardon, vidis la maron por la unua fojo en sia vivo, kaj ĝi ŝajnis al ili vastega kaj larĝa, multe pli granda ol la lagoj de Ruidera, kiujn ili vizitis en La Mancha. Ili vidis ankaŭ nombron da galeroj proksimaj al la plaĝo. Kun siaj tol-markezoj tir-falditaj, la ŝipoj montriĝis plenaj de flagoj kaj rubandoj, kiuj flirtis en la vento kaj kisis kaj balais la surfacon de la akvo. El la interno de la galeroj venis la sono de trumpetoj, hobojoj kaj klarnetoj, kaj diste kaj proksime la aero vibris per vigla milit-muziko. Tiam, sur la glata maro, la galeroj komencis manovri kaj prepari specon de eskirmo, kies movojn kvazaŭ reciprokis la movoj de nekalkulebla nombro da kavaliroj venintaj de la urbo en riĉaj uniformoj kaj sur belaj ĉevaloj. La soldatoj de la galeroj pafis per multegaj kanonoj; de la remparoj kaj fortresoj de la urbo oni respondis per peza artilerio, al kies terura bruego vento-rompa miksiĝis la tondro de la galeraĵ kanonoj. La ĝoja maro, la jubila tero kaj la aero klara, kvankam iom makulita de la fumo de la artilerio, ŝajnis vekaj kaj vibrigi en la homoj gajan spiriton. Sancho ne povis kompreni, ke la grandaj masoj moviĝantaj sur la maro posedas tiom da piedoj. Ĉe tio la kavaliroj en la riĉaj uniformoj alvenis galope, kun gajaj kaj senordaj krioj, al la loko kie don Quijote, side sur la ĉevalo, miris kaj perpleksis antaŭ la spektaklo. Unu el la kavaliroj, la ricevinto de la letero de Roque, diris laŭte al don Quijote:

—Estu bonvena en nia urbo don Quijote de La Mancha, lumo, spegulo, stelo kaj poluso de la tuta vaganta kavaliraro. Estu bonvena, mi ripetas, la kuraĝa don Quijote, ne la falsa, fiktiva kaj apokrifa lastatempe aperinta en mensogaj

historioj, sed la vera, legitima kaj aŭtenta, kies priskribon lasis al ni Cide Hamete Benengeli, la kremo de la historiistoj.

Don Quijote ne respondis eĉ unu solan vorton, kaj de sia flanko la kavaliroj ne atendis lian respondon, ĉar kune kun la ceteraj rajdantoj jam proksimiĝintaj ili komencis fari turnojn kaj karakoli ĉirkaŭ la hidalgon. Don Quijote direktis sin al Sancho kaj diris:

—Ĉi homoj bone konas min. Mi vetus, ke ili legis mian historion, kaj eĉ la laste eldonitan de la aragonano.

Tiam la sama kavaliro denove turnis sin al li kaj diris:

—Via moŝto, sinjoro don Quijote, venu kun ni; ni ĉiuj estas viaj servistoj kaj grandaj amikoj de Roque Guinart.

—Se ĝentilo generas ĝentilon —respondis don Quijote—, la via estas ido aŭ proksima parenco de la ĝentilo de la granda Roque. Konduku min, kien ajn vi volas, ĉar mi estas tute je via dispono, precipe se vi deziras utiligi min je via servo.

La kavaliro respondis per ne malpli ĝentilaj vortoj, la grupo de rajdantoj ĉirkaŭis la hidalgon kaj sin direktis kun li al la urbo, ĉe la sono de la hobojoj kaj tamburoj. Sed, kiam ili eniris tien, la diablo, kovanto de ĉia malico, kaj la buboj, eĉ pli mavaj ol la diablo mem decidis interveni: du el ili, aŭdacaj kaj petolaj, faris al si vojon tra la grupo; unu el ili levis la voston de Rocinante, la alia la voston de la azeno, kaj enpuŝis en ĉiun beston po unu faskon de ulekso. La kompatindaj animaloj sentis la pikon de tiel strangaj spronoj, alpremis la vostojn kaj sekve intensiĝis ilia doloro, ĝis tia grado, ke per mil kapriolaĉoj ĵetis teren la hidalgon kaj la ŝildiston. Don Quijote, plena de furiozo kaj de ofenditeco, detiris la belan kardotufon de sub la vosto de sia ĉevalo, kaj Sancho faris la samon al sia azeno. La eskorto de don Quijote volis puni la insolenton de la knaboj, sed tio ne eblis,

ĉar la paro da buboj perdiĝis en la amason de pli ol mil aliaj postirantaj.

Don Quijote kaj Sancho denove surseliĝis kaj, meze de la sama muziko kaj aplaŭdado, alvenis al la domo de ilia gastiganto: domo granda kaj grava, propra al la rango de riĉa kavaliro. Kaj tie ni lasas ilin nun, ĉar tion volas Cide Hamete.

Ĉapitro 62

Pri la aventuro de la ensorĉita kapo kaj pri aliaj bagateloj menciendaj

La gastiganto de don Quijote nomiĝis don Antonio Moreno, kavaliro riĉa kaj inteligenta, tre inklina al honesta kaj deca sinamuzo. Tiel do, vidante la hidalgon en sia hejmo, li pensis pri la maniero igi lin montri sian ekstravagancan spiriton, sed sen kaŭzi al li ian damaĝon, ĉar ŝerco vundanta ne estas ŝerco, kaj la amuzoj, se ofendaj al ajna persono, ne meritas tian nomon.

Li komencis per tio, igi la hidalgon demeti sian armaĵon kaj, sur balkono rigardanta al unu el la ĉefaj stratoj de la urbo, montri sin al la popolamaso kaj al la buboj, kiuj rigardis lin kvazaŭ simion.^[409] Dume la uniformuloj denove rajdis antaŭ li, kvazaŭ ili estus surmetintaj siajn paradajn vestojn je lia honoro, ne por celebri la festan tagon. De sia flanko Sancho ege ĝojis, ĉar ŝajnis al li, ke, iel aŭ alie, li trafis en novan edziĝo-feston de Camacho, en novan domon de don Diego, en novan palacon de la gedukoj. En la menciita tago, don Antonio manĝis kun kelkaj siaj amikoj, kiuj ĉiuj honoris kaj traktis la hidalgon kiel vagantan kavaliron, ĉe kio don Quijote, ravite kaj flatite, pufiĝis de vanto kaj preskaŭ krevis de plezuro. Sancho tiel spritadis, ke la servistoj de la domo, kaj la ceteraj personoj lin aŭdantaj, pendis de liaj lipoj. Kiam ili sidis ankoraŭ ĉe la tablo, don Antonio diris al Sancho:

—Ni scias ĉi tie, amiko Sancho, ke al vi tre plaĉas la blankaviandaj delikataĵoj kaj la kneloj, tiom, ke, kiam oni surtabligas al vi tro da ili, la reston vi gardas sub la ĉemizon por la sekvanta tago.

—Ne, sinjoro, tio ne veras —respondis Sancho—. Mi estas pli pur-ama ol manĝ-avida, kaj mia sinjoro don Quijote, ĉi tie antaŭ ni, scias tre bone, ke ni ofte vivtenas nin dum ok sinsekvaj tagoj per nur unu manpleno da glanoj aŭ nuksoj. Tamen, se foje oni proponas al mi ringon, mi prezentas la fingron; mi volas diri, ke mi manĝas kion ajn oni donas al mi, kaj ke mi adaptas min al la diversaj cirkonstancoj. Kaj se ajna persono asertas, ke mi estas grandioza manĝanto, sed malpura, li sciu, ke li eraras. Kaj mi dirus ĉi tion alimaniere, se mi ne konsiderus la respektindecon de la honorindaj sinjoroj ĉi tie troviĝantaj.

—Efektive —intervenis don Quijote—. La skrupulo kaj delikateco montrataj de Sancho dum li manĝas devus esti eternigitaj skribe kaj gravure sur bronzaĵoj, por ke ili ĉiam vivu en la memoro de la futuraj epokoj. Verdire, kiam li malsatas, li ŝajnas iom glutema, ĉar li maĉas rapide kaj plenbuŝe. Sed li estas plej zorga rilate al pureco, kaj en sia epoko de gubernatoro li lernis manĝi delikate, tiom, ke li kutimis preni per forko la uvojn kaj eĉ la grajnoj de la grenatoj.

—Kio! —kriis don Antonio—. Ĉu Sancho estis gubernatoro?

—Jes —respondis Sancho—. De ia insulo nomata Barataria. Mi regis ĝin bele kaj glate dek tagojn, kaj en la dirita tempo mi lernis disdegni la gubernatorecojn de la tuta mondo. Mi forkuris de la insulo, falis en kavernon, kie mi konsideris min morta, kaj nur mirakle mi saviĝis.

Don Quijote detale rakontis la tutan epizodon de la regado de Sancho, ĉe la granda plezuro de la aŭskultantoj. Post ol oni prilevis la tablon, don Antonio prenis la manon de la hidalgo kaj iris kun li en privatan ĉambron, kie, kiel sola meblo, vidiĝis nur unu tablo, ŝajne jaspita, sur bazo el la sama materialo. Sur la tablo staris busto, videble bronza, laŭ la

stilo de la kapoj de la Romanaj imperiestroj. Don Antonio ĉirkaŭpaŝis kun don Quijote la ĉambron, plurfoje rondiris la tablon, kaj diris:

—Nun, sinjoro don Quijote, kiam mi estas certa, ke oni ne aŭdas aŭ aŭskultas nin, kaj ke la pordo statas fermita, mi volas rakonti al via moŝto unu el la plej raraj aventuroj, aŭ pli ĝuste, unu el la plej eksterordinaraj novaĵoj imageblaj, kondiĉe, ke vi kaŝos en la plej sekretan fundon de via koro kion mi rivelos.

—Mi ĵuras tion fari —respondis don Quijote—. Kaj, por pli granda sekureco, mi eĉ sternos slabon sur ĝin. Sciu, don Antonio —ĉar li jam konis la nomon de sia gastiganto—, ke vi parolas al viro kun oreloj por aŭdi, sed kun lango ne por paroli. Tiel do, via moŝto povas sen ia zorgo transmeti kion vi havas en via brusto en la mian, kaj esti certa, ke mi ĝin ĵetos en la abismon de la silento.

—Fidante vian promeson —diris don Antonio—, mi volas, ke via moŝto miru, aŭdante kaj vidante kion tuj poste mi rivelos. Tiel, mi samtempe mildigos iom mian ĉagrenon ne povi komuniki mian sekreton, ĉar ne ĉiuj personoj fidindas.

Perpleksis don Quijote, atendante per kio finiĝus tia ĉirkaŭfrazado. Nu, don Antonio prenis lian manon, pasigis ĝin sur la kapo bronza, sur la tablo, sur la jaspabazo subtenanta la tuton, kaj diris:

—Ĉi kapon, sinjoro don Quijote, faris unu el la plej grandaj sorĉistoj kaj magiistoj iam loĝantaj en la mondo. Mi kredas, ke li estis polo kaj disĉiplo de la fama Escotillo, pri kiu oni rakontas tiom da mirindaj aferoj. Ĉi sorĉiston mi loĝigis ĉe mi, kaj por mil eskudoj li faris al mi ĉi kapon, kapablan respondi kion ajn oni al ĝi demandas. Li observis la direkton de la ventoj, desegnis figurojn, kalkulis la pozicion de la

planedoj, studis la zodiakajn signojn kaj fine kompletigis la kapon kun tia perfekteco, kian vi vidos morgaŭ, ĉar la vendredojn ĝi mutas, kaj ĝuste hodiaŭ estas vendredo. Dume via moŝto pensu kion demandi al ĝi: mi scias per propra sperto, ke ĝiaj respondoj diras la veron.

Don Quijote tiel miris ĉe la kapablo de la kapo, ke li apenaŭ kredis la asertojn de don Antonio; sed vidante, ke li devas atendi nur tempeton por fari la provon, la hidalgo preferis diri nenion kaj limiĝis danki lin pro la rivelado de tiel granda sekreto. Ili eliris el la ĉambro, don Antonio ŝlisis la ĉambron, kaj ambaŭ sin direktis al la salono, kie sidis la ceteraj kavaliroj, kaj kie, antaŭe, kiam lia mastro forestis, Sancho rakontis al ili nombron da aventuroj kaj eventoj okazintaj al don Quijote.

En la vespero de la sama tago, oni promenigis la hidalgon tra la urbo, kaj ĉi-foje li portis, ne la armaĵon, sed stratan veston kaj longan surtuton el flava ŝtofo, tiel dika, ke ĝi kapabluŝvitigi, en tia sezono, eĉ la glacieron mem. La kavaliroj antaŭe ordonis al siaj servistoj distri Sanchon, ke li ne eliru el la domo. Don Quijote rajdis, ne sur Rocinante, sed sur forta mulo egalpaŝa kaj riĉe harnisita. Nu, kiam li ekiris, oni alkudris al lia surtuto, sen ke li konscius, pecon de pergameno kun la jena teksto en grandaj literoj: «Jen don Quijote de La Mancha». Tuj kiam li komencis sian rondiron, la skribo altiris ĉies atenton, kaj tial, ke multaj preterpasantoj proksimiĝis vidi lin kaj legis voĉe «Jen don Quijote de La Mancha», la hidalgo miris, ke tiel granda nombro da homoj, rigardas, nomas kaj konas lin. Li turnis sin do al don Antonio kaj diris:

—Grandaj estas la meritoj de la vaganta kavalirismo, se konsideri, ke ĝiaj membroj fariĝas konataj kaj famaj ĉie tra la mondo. Pruve de tio, rimarku, don Antonio, ke eĉ la strataj buboj konas min, kvankam ili neniam antaŭe min vidis.

—Vi pravas, sinjoro don Quijote —respondis don Antonio—. Same kiel oni ne povas teni la fajron kaŝita kaj enfermita, tiel same oni ne povas ignori la virton; kaj la virto akirita per la profesio de la armoj brilas kaj elstaras pli ol la ceteraj virtoj.

Nu, kiam don Quijote rajdis meze de la popola rekono, unu kastiliano, leginte la pergamenon, diris laŭte:

—La diablo vin prenu, don Quijote de La Mancha! Kiel vi povis alveni ĉi tien post la senfina nombro da vergoj falintaj sur vian dorson? Vi estas freneza, kaj se vi frenezus private kaj trans fermitaj pordoj, vi ne farus grandan damaĝon; sed vi havas la specialaĵon ŝanĝi ajnan personon, kiu traktas kun vi, en frenezan aŭ stultan. Pruve de tio, jen ĉi sinjoroj vin akompanantaj. Reiru al via hejmo, idioto, zorgu pri viaj havo, edzino kaj filoj kaj deturnu vin de ĉi absurdoj, kiuj rastas al vi la cerbon kaj ronĝas vian komprenon.

—Frato —diris don Antonio—, sekvu vian vojon, kaj ne donu konsilojn, se oni ilin ne petas. La sinjoro don Quijote de La Mancha tre saĝas, kaj ni, liaj akompanantoj, ne stultas. La virton oni devas honori, kie ajn oni ĝin trovas. Jam foriru al la diablo, kaj ne miksiĝu en tion, kio ne koncernas vin.

—Nu, via moŝto pravas —respondis la kastiliano—. Vere, konsili ĉi kompatindan viron egalas batadi la venton. Tamen, bedaŭrindas, ke la saĝo laŭdire montrata de ĉi idioto, kiam li parolas pri io ajn, fine forfluas per la kanalo de lia vaganta kavalirismo. Kaj, kiel via moŝto diris, la diablo min prenu, kaj ankaŭ mian idaron, se de nun, kaj eĉ se mi vivus pli da jaroj ol Metuŝelaĥ, mi donus konsilon, petitan aŭ ne petitan, al ajna persono.

La konsilinto foriris, kaj la aliaj daŭrigis la promenadon. Sed tiel agitiĝis la buboj kaj la ceteraj homoj, legante la skribon,

ke don Antonio detiris ĝin, ŝajnigante, ke ĝi detiras alion. La nokto falis, la grupo revenis al la domo, kaj tie havis lokon danc-amuzo organizita de la damoj, ĉar la edzino de don Antonio, virino alt-ranga, bela, saĝa kaj gaja invitis nombron da siaj amikinoj veni honori ŝian gaston kaj samtempe amuziĝi per liaj neimageblaj ekstravagancoj. Ne malmultaj damoj ĉeestis kaj, post riĉa manĝo, la balo komenciĝis preskaŭ je la deka horo nokte. Ĉefe du el la damoj havis petolan kaj ridan humoron kaj, kvankam tre honestaj, kondukis iom libere kaj permesis al si maliceti per ŝercoj amuzaj, sed ne ofendaj. Tiel ofte kaj rapide ili alternis invitante la hidalgon danci, ke ili muelis ne nur lian korpon, sed eĉ lian animon. Vere vidinda aspektis la figuro de don Quijote: longa, magra, flava, en tro strikta vesto, kaj kun movoj sengraciaj kaj, precipe, pezaj.

Ĉi dametoj koketis al li kvazaŭ kaŝe, kaj de sia flanko li same kaŝe ignoris ilian flirtemon. Sed, vidante sin sieĝata de iliaj sugestoj flataj vortoj, li levis la voĉon kaj diris:

—*Fugites, partes adversae.*^[410] Lasu min en paco, tentaj pensoj. Nu, sinjorinoj, viaj deziroj ne tuŝas min, ĉar la reĝino de la miaj, la senegala Dulcinea de El Toboso, ne konsentas, ke alies sopiroj min venku kaj regu.

Kaj tion dirante, konsumita kaj muelita de la danca ekzercado, li sidiĝis sur la plankon meze de la salono. Don Antonio ordonis transporti lin brake al ties lito, Sancho iris la unua lin levi kaj diris:

—Grandioze vi dancis, sinjoro mastro! Ĉu vi kredas, ke ĉiuj kuraĝaj homoj scipovas danci, kaj ke ĉiuj vagantaj kavaliroj lertas en la balo? Nu, se vi tion pensas, vi eraras. Ekzistas personoj pretaj mortigi giganton prefere ol fari kapriolon. Se vi devus klak-danci, mi povus anstataŭi vin, ĉar mi klakadas

per la piedoj vere bone. Sed rilate al dancado salona, mi estas nura nulo.

Per ĉi vortoj kaj aliaj similaj Sancho igis ridi la homojn en la balo. Li kuŝigis lian mastron en la liton kaj kovris lin ĝis la oreloj, ke li ŝvitu, por ke li ne malvarmumu post sia sinmovado en la balo.

La sekvantan tagon, don Antonio decidis submeti al provo la ensorĉitan kapon, do li enfermiĝis en la privata ĉambro, akompanate de don Quijote, Sancho, aliaj du amikoj, kaj la du damoj, kiuj turmentis la hidalgon en la balo, kaj kiuj pasigis la nokton kun la edzino de don Antonio. Ĉi lasta rivelis al la grupo la kapablon de la kapo, petis ilin gardi la sekreton, kaj diris, ke nun, por la unua fojo, oni kontrolos, ĉu ĝi efektive funkcias. Nur la du amikoj de don Antonio konis la veron pri la ensorĉo, kaj se don Antonio ne estus antaŭe rivelinta ĝin al ili, ankaŭ ilin frapus ŝoko, same kiel la ceterajn: tiel lerte kaj perfekte konstruita vidiĝis la kapo!

Don Antonio mem proksimiĝis la unua kaj diris flustre, tamen aŭdeble, en la orelon de la busto:

—Diru, kapo, per via propra kapablo: kion mi pensas nun?

Kaj, sen movi la lipojn, la kapo respondis kun klara kaj tre komprenebla voĉo:

—Pri pensoj mi ne traktas.

Ĉi vortoj ŝokis ĉiujn, des pli, ke nek en la ĉambro, nek proksime al la tablo troviĝis ajna persono povanta diri la respondon.

—Kiom da homoj estas ĉi tie? —demandis denove don Antonio.

—Vi kaj via edzino —respondis la kapo— kun du amikoj viaj, du amikinoj ŝiaj, unu fama kavaliro nomata don Quijote de La Mancha kaj ties ŝildisto, Sancho Panza laŭnome.

Tiam la stuporo atingis la kulminon, kaj iliaj haroj stariĝis de teruro. Don Antonio apartiĝis de la kapo kaj diris:

—Tio sufiĉas al mi por juĝi, ke min ne trompis la viro vendinta ĝin al mi, ho saĝa kapo, parolkapabla kapo, responda kapo kaj admirinda kapo! Alia iru kaj demandu laŭvole.

Kaj tial, ke la virinoj ĝenerale havas naturon senpacienca kaj scivolana, unu el la du amikinoj de la edzino de don Antonio proksimiĝis la unua kaj demandis:

—Diru al mi, kapo: kion mi faru por esti tre bela?

—Konduti tre ĉaste —venis la respondo.

—Nenion plian mi demandos —diris la virino.

Poste proksimiĝis ŝia kunulino kaj diris.

—Kapo, mi volus scii, ĉu mia edzo amas min aŭ ne.

—Juĝu laŭ lia konduto al vi —respondis la kapo.

—Efektive, tia demando ne bezonis respondon, ĉar la faroj de la homoj proklamas ilian intencon —diris la damo, sin retirante.

Poste unu el la amikoj de don Antonio aliris kaj demandis:

—Kiu mi estas?

—Vi tion scias —venis la respondo.

—Tio ne respondas mian demandon. Mi volis scii, ĉu vi konas min.

—Jes, mi konas. Vi estas don Pedro Noriz —respondis la voĉo.

—Mi ne deziras scii ion plian. Tio sufiĉas por konvinki min, ke vi ĉion konas.

Li apartiĝis, aliris la alia amiko kaj demandis:

—Diru, kapo: kion deziras mia heredonta filo?

—Mi jam diris —venis la respondo—, ke pri deziroj mi ne traktas. Tamen mi konfesu, ke fakte li deziras enterigi vin.

—Vi pravas —diris la kavaliro—. Tio estas videbla kaj palpebla.

Li ne plu demandis, la edzino de don Antonio proksimiĝis kaj diris:

—Mi ne scias, pri kio demandi vin, kapo. Mi volus scii nur, ĉu mi ĝuos mian karan edzon ankoraŭ multe da jaroj.

—Jes —respondis la voĉo—, ĉar liaj sano kaj sobro garantias al li longajn jarojn de vivo, dum aliaj homoj kutimas kurtigi la sian per diboĉo.

Tiam don Quijote proksimiĝis kaj demandis:

—Diru, respondulo: ĉu estis vero aŭ nur sonĝo tio, kion mi rakontis pri miaj aventuroj en la kaverno de Montesinos? Ĉu la skurĝado de Sancho kompletiĝos? Ĉu la elsorĉo de Dulcinea venos al sia fino?

—Multon oni povus diri pri viaj aventuroj en la kaverno: ili estas parte veraj, parte imagaj. La skurĝado de Sancho

progresos tre lante. La elsorĉo de Dulcinea atingos sian finon.

—Nenion plian mi deziras scii —respondis don Quijote— ĉar, se mi vidos Dulcinean elsorĉita, mi konsideros, ke min trafis bloke ĉiuj favoroj de la fortuno.

Laste aliris Sancho kaj demandis:

—Ĉu eble mi havos alian gubernatorecon? Ĉu mi forlasos ĉi mizeran vivon ŝildistan? Ĉu mi vidos denove miajn edzinon kaj filojn?

—Vi regos en via propra hejmo —respondis la voĉo—. Se vi reiros al ĝi, vi vidos vian familion, kaj se vi ĉesos servi vian mastron, vi ĉesos esti ŝildisto.

—Bele, je Dio! —kriis Sancho—. Tion saman mi povus respondi al mi! La profeto Perogrullo^[411] ne superus vian talenton.

—Besto, kion vi volas, ke li respondu? —diris don Quijote—. Ĉu ne sufiĉas, ke la respondoj de ĉi kapo kongruas kun la demandoj?

—Jes, sufiĉas —respondis Sancho—, sed al mi plaĉus, se ili estus pli longaj kaj signifaj.

Per tio finiĝis la demandoj kaj respondoj. Sed ne finiĝis, ke la ĉeestantoj plu stuporis, se escepti la du amikojn de don Antonio, konantojn de la sekreto. Kaj ĉi sekreton volas jam riveli Cide Hamete Benengeli, por ke la mondo ne perpleksu, kredante, ke ia magia aŭ stranga mistero sidas en ĉi kapo. Tiel do li deklaras, ke don Antonio Moreno, por sia propra amuzo kaj por mistifiki la sensciajn, konstruis ĝin en sia hejmo, imitante alian kapon, kiun, kreitan de skulptisto, li antaŭe vidis en Madrid. Kaj jen la procedo de la konstruo: la

plato de la tablo estis el ligno pentrita kaj vernisita, ke ĝi ŝajnu jaspa, kaj la bazo konsistis el la sama materialo, garnita per kvar aglaj krifoj por pli bone subteni la tuton. La kapo, simila al la bronzaĵaj portreto-bustoj de la Romanaj imperiestroj, estis kava, same kiel la supro de la tablo, kaj ambaŭ kupliĝis tiel perfekte, ke ne rimarkeblis eĉ la plej eta junto. Ankaŭ la bazo de la tablo estis kava kaj komuniĝis kun la gorĝo kaj kapo de la busto, kaj la tuto kombiniĝis kun aperturo tra la plafono de la suba ĉambro. Tra ĉi kavoj de la bazo, la tablo, la busto kaj la gorĝo iris metala tubo, tiel bone instalita, ke ne eblis rimarki ĝin. En la suba ĉambro, responda al la supra, staris la homo faranta la respondojn kun la buŝo alpremita al la tubo, tiel, ke la supraj voĉoj subiris, kaj la suba voĉo surpris, klare kaj perfekte aŭdeblaj, kaj ĉi-maniere oni ne povis koni la artifikon. La respondanto estis nevo de don Antonio, studento saĝa kaj sagaca; kaj tial, ke lia onklo anticipis informis lin pri la personoj irontaj kun li en la ĉambron, estis al li facile respondi prompte kaj ĝuste la unuan demandon, kaj per konjektoj kaj lerte —ĉar li estis ankaŭ lerta— la ceterajn.

Cide Hamete plu rakontas, ke ĉi mirinda parol-kapo plu funkciis proksimume dek aŭ dek du tagojn. Sed, kiam diskoniĝis tra la urbo, ke don Antonio posedas ĉi ensorĉitan kapon, kiu respondas ĉian demandon, li, timante ke la novaĵo povus trafi la akran orelon de la sentineloj de nia religio, informis pri la tuta afero al la sinjoroj inkvizitoroj, kaj ili ordonis ne plu uzi la kapon kaj ĝin detruigi, por ke la sencia popolo ne skandaliĝu. Sed don Quijote kaj Sancho ĉiam havis la opinion, ke la kapo estis ensorĉita kaj parol-kapabla, kio pli plaĉis al la hidalgo ol al la ŝildisto.

La kavaliroj de la urbo, en sia deziro plezurigi don Antonion, distri la hidalgon kaj doni al li okazon montri siajn ekstravagancojn, aranĝis ringo-turniron^[412] okazontan post ses tagoj, kvankam ĝi ne efektiviĝis pro la motivo, kiun oni

poste klarigos. Don Quijote deziris vagi tra la urbo piede kaj senceremonie, ĉar li timis, ke, se li irus rajde, la buboj postkurus lin. Tiel do, li, Sancho kaj du servistoj disponigitaj de don Antonio eliris promeni, kaj okazis, ke, irante sur strato, don Quijote levis la rigardon kaj vidis la jenon skribitan super la pordo de domo: «Ĉi tie oni presas librojn», kio tre plaĉis al li, ĉar neniam antaŭe li vidis presejon kaj scivolis pri ĝia funkciado. Li eniris kun sia tuta akompanantaro kaj vidis presi ie, korekti provojn tie, komposti aliloke kaj ŝanĝi tipojn pretere. Fakte, li vidis la tutan proceson de grava presejo. Don Quijote eniris en diversajn fakojn, demandis kion oni tie faras, la labormajstroj donis la necesajn klarigojn, la hidalgo tre interesiĝis kaj plu iris. En alia fako li same demandis al la labormajstro pri lia tasko.

—Sinjoro —li respondis—, la kavaliro tie staranta (kaj li montris viron de bela figuro kaj serioza sinteno) tradukis libron el la toskana en la kastilian, kaj mi ĝin kompostas por baldaŭa eldono.

—Kiun titolon havas la libro? —demandis don Quijote.

—En la toskana, la libro titoliĝas *Le bagatelle* —respondis la aŭtoro.

—Kaj kion signifas *le bagatelle* en la kastilia? —demandis don Quijote.

—*Le bagatelle* —diris la aŭtoro— signifas proksimume «la bagateloj» kaj, kvankam la libro havas humilan titolon, ĝi entenas nombron da solidaj kaj substancaj aferoj.

—Mi iom konas la toskanan —respondis don Quijote— kaj mi fieras, ke mi povas kanti kelke da strofoj el Ariosto. Sed via moŝto bonvolu diri al mi (kaj mi demandas, ne kun la

intenco ekzameni vian scion, sed simple pro scivolo), ĉu vi trovis en via traduko-laboro la vorton *pignata*?

—Jes, ofte —respondis la aŭtoro.

—Kaj kiel vi tradukas ĝin en la kastilian?

—Kiel do, se ne skribante «kuirpoton»?

—Je Dio! —kriis don Quijote—. Kiel multe vi progresis en la toskana lingvo! Mi vetus, ke, kie la toskana diras *piace*, via moŝto skribas en la kastilia «plaĉas»; kie *piú*, «plu»; kie *su*, «supre», kaj kie *giú*, «sube».

—Jes, certe —respondis la aŭtoro—. Ili estas iliaj ĝustaj tradukoj.

—Nu, mi ĵurus —diris don Quijote—, ke via moŝto ne famiĝis en ĉi mondo ĉiam malinklina premii la talenton kaj la meriton. Kiom da kapabloj ĉie perditaj! Kiom da inteligentaj homoj ignorataj! Kiom da talentuloj disdegnataj! Tamen, ŝajnas al mi, ke traduki el unu lingvon en alian (se oni esceptas la suverenajn lingvojn grekan kaj latinan, similas rigardi la renverson de flandra tapiŝo, ĉar, kvankam la figuroj ankaŭ tie videblas, ili ne montras la glaton kaj brilon de la ĉefa flanko, ĉar duonkaŝitaj de la fadenoj. Kaj traduki el facilaj lingvoj ne implicas la posedon de pli da talento aŭ da stilo ol necesas por kopii ion el unu papero en alian. Nu, mi ne volas diri, ke la tradukarto estas ne laŭdinda: efektive, oni povus okupi sin per aliaj pli mavaj kaj malpli profitaj aferoj. El ĉi rimarko mi esceptas du famajn tradukintojn: doktoron Cristóbal de Figueroa,^[413] pro ties *Paŝtisto Fido*, kaj don Juan de Jáuregui^[414] pro ties *Aminta*, ĉar, ĉe tiaj versioj, oni dubas, ĉu temas pri tradukoj aŭ pri originaloj. Sed bonvolu diri al mi, sinjoro: ĉu vian libron oni presas je via kosto, aŭ vi cedis la rajton al eldonisto?

—Mi ĝis presas je mia kosto —respondis la aŭtoro—, kaj el ĉi unua eldono de du mil ekzempleroj mi pensas gajni almenaŭ mil dukatojn. Oni tre facile vendos ilin po ses realoj.

—Kiel bele vi kalkulas! —ironiis don Quijote—. Evidentas, ke vi ne scias pri la artifikoj de la presistoj kaj pri la ruzaj kombinoj, kiujn ili aranĝas inter si. Kiam vi vidis vin ŝarĝita per du mil ekzempleroj de la libro, ilia pezo tiel vin dispremos, ke vi teruriĝos, des pli, se la verko havas ne multan intereson kaj spicon.

—Kion fari do? —diris la aŭtoro—. Ĉu vi volas, ke mi cedu mian rajton al eldonisto, kiu pagus al mi tri maravedojn, kaj eĉ pensus, ke li faras al mi grandan favoron? Mi eldonas miajn librojn, ne por akiri famon en la mondo (mi ja estas ĉie konata pro miaj verkoj), sed por gajni monon, ĉar famo sen mono valoras eĉ ne unu soldon.

—Dio donu bonan sorton al via moŝto —respondis don Quijote.

Kaj li iris en alian fakon, kie li vidis korekti folion de libro titolita *Lumo de la animo*.

—Ĉi-specaj libroj, kvankam jam multenombraj —diris la hidalgo—, devus plu eldoniĝi, ĉar nuntempe tro abundas la pekuloj, kaj necesas senfina nombro da lumoj por tiom da personoj loĝantaj en la tenebro.

Li plu iris kaj vidis, ke oni same korektas alian libron. Li demandis pri ĝia titolo, kaj oni respondis, ke temas pri la *Dua parto de la inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha*, verkita de ia aŭtoro naskiĝinta en Tordesillas.

—Oni jam informis al mi pri ĉi libro —diris don Quijote— kaj, vere kaj sincere, mi pensis, ke oni jam bruligis kaj konvertis ĝin en cindron pro ĝia impertinento. Sed, kiel ĉiu porko, ĝi

havos sian tagon de Sankta Marteno.^[415] La fikciaj historioj estas des pli allogaj kaj ĝuindaj, ju pli ili alproksimiĝas al la realo kaj al la verŝajno.

Kaj li eliris el la presejo, montrante ioman indignon. En la sama tago, don Antonio aranĝis, ke la hidalgo vizitu la galerojn proksimajn al la plaĝo, kio donis multe da ĝojo al Sancho, ĉar li neniam antaŭe vidis ilin. Don Antonio informis la admiralon de la ŝipoj, ke en la posttagmezo li vizitos lin kun sia gasto la fama don Quijote de La Mancha, pri kies persono jam aŭdis la admiralon, kaj ankaŭ la loĝantaro de la urbo. Sed tion okazintan al la hidalgo en la galeroj oni rakontos en la sekvanta ĉapitro.

[409] Aludo al la iama moro havi simiojn alligitaj al la balkonoj, kio donis motivon al la preterpasantoj, ĉefe al la knaboj, halti por rigardi iliajn gestojn kaj saltojn.

[410] Latine: «forkuru, malamikoj». Parto de ekzorca formulo de la katolika eklezio.

[411] Oni diras, ke la fikcia Perogrullo nomis la fermitan manon pugno, kaj de tio venas, ke oni aludas lin, kiam iu diras aserton aŭ veron tiaspecan.

[412] Sporto de militistoj: galopante sur ĉevalo, oni celis per lanco trafi tra ringegon lokitan je ioma distanco de la kurejo.

[413] Hispana verkisto kaj poeto (1571-1639), samtempulo de Cervantes.

[414] Andaluza poeto kaj pentristo, al kies penikoj oni atribuas la portreton de Cervantes, hodiaŭ posedatan de la Hispana Akademio de la Lingvo.

[415] Plu vivas ankoraŭ, en certaj vilaĝoj, la olda moro buĉi la porkojn, por hejma konsumado, en la 11-a de novembro, tago de Sankta Marteno. En figura senco: ĉiu misfaranto nepre ricevos sian merititan punon.

Ĉapitro 63

Pri kiel la vizito de Sancho al la galeroj havis por li mavan sekvon, kaj pri la nova aventuro de la bela maŭrino

Profunde cerbumis don Quijote pri la respondoj de la ensorĉita kapo, sen ke li sukcesus diveni la trukon. Liaj meditoj ĉiam kondukis lin al la aŭguro, kiun li senhezite kredis, pri la elsorĉo de Dulcinea, kaj li ĝojis en sia koro, pensante, ke ĝi baldaŭ okazos. Rilate al Sancho, kvankam li abomenis la oficon de gubernatoro, kiel dirite, tamen li deziris ankoraŭ ordoni kaj esti obeata: tian venenan efekton kaŭzas la aŭtoritato, eĉ la ŝajna.

Nu, en la sama tago don Antonio Moreno kaj liaj du amikoj akompanis la hidalgon kaj ties ŝildiston al la galeroj. Oni jam informis la admiralon pri ilia vizito, kaj apenaŭ la fama paro alvenis al la plaĝo, oni tir-faldis la tol-markezojn de la galero, kaj aŭdiĝis la sono de hobojoj; poste oni tuj ĵetis al la akvon boaton, garnitan per riĉaj tapiŝoj kaj per kusenoj el karmezina veluro, kaj en la momento kiam don Quijote metis la piedon en ĝin, la flag-ŝipo pafis per unu el siaj kanonoj, kaj la aliaj galeroj faris same. La hidalgo surpris la ĉefan eskalon, la tuta ŝipanaro salutis lin per tri-kria aklamado, dirante: «Hu, hu, hu!», kiel oni kutimas ĉe la eniro de grava persono en la galerojn, la generalo (ni donu al li ĉi titolon), unu el la ĉefaj nobeloj el Valencia, etendis al don Quijote sian manon kaj diris:

—Ĉi tagon mi signos per blanka ŝtono, ĉar certe mi ne ĝuos alian pli bonan en mia tuta vivo, se konsideri, ke mi renkontas hodiaŭ sinjoron don Quijote de La Mancha, kies

persono reprezentas la kvintesencon de la vaganta kavalirismo.

Don Quijote, tre feliĉa vidi sin tiel sinjorece traktata, respondis per samaj ĝentilaj komplimentoj. Poste, la tuta grupo eniris en la poban kastelon, tre bele ornamitan, kaj sidiĝis, dum la maato aperis sur la ferdeko, blovis signalon per la fajfilo, por ke la ŝipanaro demetu sian ĉemizon, kion ili faris en unu momento, kaj Sancho, vidante tiom da viroj duonnudaj, stuporis, des pli, kiam li observis ilin etendi la tol-markezojn tiel rapide, ke ŝajnis al li, ke ĉiuj diabloj laboras tie. Sed tio estis nura bagatelo kompare kun la tuj sekvanta okazaĵo: Sancho sidis ĉe markez-stango, apud la dekstra-flanka *espaldero*,^[416] kiu, pli frue instrukciita pri sia rolo, kaptis Sanchon, levis lin per la brakoj, kaj la remistoj, jam stare pretaj, ĵetis lin de unu al la alia, kaj de benko al benko, laŭlonge de la triborda flanko, tiel rapide, ke la kompatinda Sancho perdis la vidon el siaj okuloj, kaj sendube pensis, ke la diabloj mem fortaŭzas lin. La remistoj ne haltis, ĝis ili sendis lin returne, laŭlonge de la benkoj kaj brakoj de la baborda flanko, denove al la pobo. La povra ŝildisto restis tie tradraŝita, ŝvitoplena, anhelanta, nekapabla kompreni tion al li okazinta. Don Quijote, vidinte Sanchon iri senflugile tra la aero, demandis al la generalo, ĉu oni kutime regalias per tia ceremonio al la personoj vizitantaj por la unua fojo la galerojn, kaj aldonis, ke, se tiel, li ne deziras submetiĝi al tia inicado, ĉar li ne havas intencon profesii en la ŝipoj. Kaj li ĵuris je Dio, ke se ajna persono permesus al si meti sur lin la manon por igi lin flugi, li elbatus lian animon el lia korpo. Kaj, tion dirante, la hidalgo ekpemis la glavon.

Ĉi-momente oni descendigis la markezon, kaj, kun terura bruo, lasis fali la anten-velon de la topo de la masto ĝis la ferdeko. Sancho pensis, ke la ĉielo sin forskuas de siaj ĉarniroj kaj falas sur lian kapon, kaj terurite li metis ĝin inter

siajn krurojn. Ankaŭ don Quijote perdis la trankvilon, timotremis, kuntiris la ŝultrojn kaj paliĝis. Tiam la ŝipanoj hisis la velon kun la samaj rápido kaj bruo, laborante en silento, kvazaŭ mankus al ili la voĉo kaj la spiro. La maato faris signon levi la ankron, kuris samtempe al la benkarro, kie sidis la remistoj, kaj komencis skurĝi al ili la dorson, dum la galero glitis iom post iom for de la bordo.

Kiam Sancho vidis, ke tiom da ruĝaj piedoj samtempe moviĝas, ĉar li imagis la remilojn piedoj, li diris en si:

—Jen veraj kaj efektivaj aferoj de ensorcô, kiaj ne estas tiuj de don Quijote. Kion faris ĉi mizeruloj, ke oni skurĝas ilin tiamaniere? Kial ĉi viro, iranta de unu loko al la alia kun sia fajfilo, kuraĝas li sola vipi tiom da homoj? Sendube ĉi tio estas la infero aŭ, almenaŭ, la purgatorio.

Don Quijote, rimarkante, ke Sancho observas ĉion ĉirkaŭe kun granda atento, diris:

—Ho, amiko Sancho, kiel rapide kaj facile vi povus, se vi volus, nudigi vin ĝis la zono, sidiĝi inter la sinjoroj remistoj kaj meti finon al la ensorcô de Dulcinea! Meze de la turmento kaj mizero de tiom da homoj, via propra doloro ne estus al vi tiel intensa, des pli, ke la saĝulo Merlín eble taksus ĉiun el ĉi vipobatoj ekvalenta al dek el la viaj, se konsideri, ke ilin ellasas sperta kaj forta mano.

La generalo volis demandi pri la skurĝado kaj pri ĉi ensorcô de Dulcinea, sed tiam avizis gvatisto:

—La turo de Montjüich signalas, ke ĉe la okcidenta flanko, proksime al la bordo, navigas rimo-ŝipo.

Tion aŭdinte, la generalo saltis inter la remistojn kaj diris:

—Vigle, fratoj! Ne lasu ĝin eskapi! Sendube la turo signalas ian brigantinon de alĝeriaj piratoj.

La tri aliaj galeroj tuj proksimiĝis al la flag-ŝipo por ricevo de ordonoj. La generalo instrukiis, ke du galeroj sin direktu al la aperta maro, dum li kun la alia, iros laŭlonge de la bordo, kaj tiel la korsaro ne povas eskapi. La remistoj streĉis kun tia elano, ke la galeroj peliĝis antaŭen kvazaŭ fluge. La du navigintaj al la aperta maro trovis, kiam ili distanciĝis proksimume du mejlojn, ŝipon kun, laŭ vida takso, dek kvar aŭ dek kvin remo-bennoj, kies nombro estis, efektive, laŭa al la takso. Kiam la brigantino rimarkis la galerojn, ĝi manovris kun la espero eskapi dank' al sia rápido, sed ĝiaj movoj ne sukcesis, ĉar la flagŝipo, unu el la ple rapidaj sur la maroj, tiel reduktis la distancon, ke la viroj de la malamika korsaro bone komprenis, ke eskapo ne eblas. Ilia kapitano pretis ordoni, ke la remistoj haltu, por tuj poste kapitulaci kaj eviti, ke la generalo de la galeroj pli furiozu. Sed la fato disponis alie, ĉar, kiam la flag-ŝipo proksimiĝis sufiĉe, por ke la viroj de la brigantino aŭdu la kriojn, ke ili kapitulacu, du *torakis*^[417] el la dek kvar turkoj de la korsaro pafis per siaj musketoj kaj mortigis du soldatojn postenigitajn en nia prua kastelo. Ĉe tio la generalo ĵuris ne lasi unu solan viron viva en la brigantino, sed, kiam li komencis alimpeti al ĝi kun ekstrema furiozo, la korsaro flanke preterglitis. La galero iom distanciĝis pro la akirita rápido, kaj la piratoj, vidante sin perditaj, manovris la velon, kaj per veloj kaj remiloj provis denove eskapi, dum la galero faris turnon por reveni. Sed la diligento de la piratoj ne savis ilin de la puno aplikenda pro ilia misfaro, ĉar la flag-ŝipo atingis la brigantinon en proksimume duona mejlo, albatis al ĝia pavezo la remilaron, kaj ĉiuj piratoj kaptiĝis vivaj. Ĉe tio alvenis la du aliaj galeroj, kaj la kvar, kune kun la predo, sin direktis al la plaĝo, kie nekalkulebla popolamaso atendis, dezirante vidi kion la galeroj kaptis. La generalo ĵetis ankron proksime al la bordo, rimarkis, ke la vic-reĝo de la urbo troviĝas sur la

plaĝo, sendis la boaton, ke ĝi transportu lin al la ŝipo, ordonis descendigi la antenon por tuj pendumi la kapitanon kun la ceteraj piratoj kaptitaj en la brigantino, proksimume tridek ses, ĉiuj brav-aspektaj, pliparte turkaj musketistoj. La generalo demandis, kiu estas la kapitano de la korsaro, kaj unu el la kaptitoj, ŝajne hispana renegato, respondis al li en la kastilia, dirante:

—Ĉi junulo ĉi tie, sinjoro, estas nia kapitano.

Kaj li montris junulon ŝajne ne ankoraŭ dudek-jaran, unu el la plej belaj kaj graciaj knaboj koncepteblaj de la homa imago. Tiam la generalo demandis al li:

—Diru, miskonsilita hundo, kio movis vin mortigi miajn soldatojn, malgraŭ ke vi vidis vian eskapon neebla? Ĉu vi montras tiamaniere vian respekton al flag-ŝipo? Ĉu vi ne scias, ke temeraro kaj kuraĝo ne estas la sama afero? Ioma espero pri saviĝo devus puŝi nin esti aŭdacaj, ne temeraraj.

La kapitano volis respondi, sed tiam la generalo ne havis tempon aŭskulti, ĉar la vic-reĝo, kun kelkaj el siaj servistoj kaj pluraj personoj de la urbo, ĵus surŝipiĝis, kaj necesis bonvenigi lin.

—Bonan predon vi kaptis, sinjoro generalo —diris la vic-reĝo.

—Tiel bonan, ke via ekscelenca moŝto tuj vidos ĝin pendi de la anteno.

—Kial? —demandis la vic-reĝo.

—Ĉar, kontraŭ ĉiaj leĝoj kaj kutimoj de la milito, ili mortigis al mi du el la plej bonaj soldatoj de ĉi galeroj, kaj mi ĵuris pendumi la kaptitojn senescepte, precipe ĉi junulon, la kapitano de la brigantino.

Kaj li montris la kapitanon, kiu jam atendis la morton kun la manoj kunligitaj kaj kun la ŝnuro ĉirkaŭ la kolo. La vic-reĝo rigardis lin, rimarkis lian belon, lian gracion, kaj lian rezignacion, impresiĝis de lia ĉarmo, efikanta kiel plej bona rekomenda letero, kaj sentis la deziron savi lin de la morto. Tiel do li demandis:

—Diru, kapitano. Ĉu vi estas turko, maŭro aŭ renegato?

Same en la kastilia, la junulo respondis:

—Nek turko, nek maŭro, nek renegato.

—Kio do? —demandis la vic-reĝo.

—Kristana virino —respondis la junulo.

—Ĉu virino kristana en tia kostumo kaj en tia situacio? Afero pli admirinda ol kredinda...

—Sinjoroj, prokrastu mian ekzekuton —diris la junulo—. Vi ne multe perdos, se vi plenumos vian venĝon iom pli tarde, post ol mi rakontos al vi la historion de mia vivo.

Ĉu povus ekzisti homo kun tiel dura koro, ke li ne moliĝus ĉe tiaj vortoj, kaj ne aŭskultus almenaŭ kion la trista kaj kompatinda junulo volis diri? La generalo respondis, ke li parolu laŭplaĉe, sed sen esperi, ke oni povus pardoni lian delikton.

Kun ĉi permeso la junulo komencis paroli jene:

—Mi naskiĝis de mudeharaj gepatroj, do apartenas al popolo sen prudento kaj fortuno laste ricevinta maron da mizeroj. En tiel angora vivo, du el miaj onkloj prenis min kun si al Berberio, ĉar, kvankam mi insistis, ke mi estas kristanino, ne ŝajna kaj falsa, sed vera kaj sincera (kio fakte kaj efektive mi

estas) miaj argumentoj vanis. Ili ne havis influon kontraŭ la funkciuloj komisiitaj trudi la efektiviĝon de nia mizera ekzilo, kaj ankaŭ miaj propraj onkloj pensis, ke mi mensogas kun la celo resti en la lando, kie mi naskiĝis, do ili prenis min kun si kontraŭ mia propra volo. KREDU min, mi havis patrinon kristanan kaj patron saĝan kaj kristanan. Mi suĉis la katolikan religion kun la patrina lakto, ricevis bonan edukon, kaj ne montris per mia lingvo aŭ per mia konduto mian maŭrinecon, Samtempe kun tiaj virtoj (ĉar mi konsideras ilin virtoj) kreskis mia belo, se belon mi havas, kaj mi vivis en granda izolo kaj enfermiteco, tamen ne tiel granda, ke ne havus okazon vidi min juna nobelo nomita don Gaspar Gregorio, pli aĝa filo de kavaliro, kiel bieno limas kun nia vilaĝo. Rakonti al vi kiel li vidis min, kiel ni parolis unu la alian, kiel li freneze enamiĝis al mia persono kaj kiel mi apenaŭ atentis lin, daŭrus tro longe, del pli, ke mi timas, ke la kruela ŝnuro min minacanta inter la gorĝo kaj la lango ne lasus al mi sufiĉan tempon. Mi diru nur, ke don Gregorio volis akompani min en mia ekzilo. Li miksiĝis kun maŭroj de aliaj lokoj (li tre bone scipovis ilian lingvon) kaj sur la vojo li amikiĝis kun miaj du onkloj, kun kiuj mi vojaĝis, ĉar mia patro, saĝa kaj antaŭvidema, foriris de la vilaĝo, tuj kiam li aŭskultis la unuan proklamon pri nia ekzilo, kaj direktis sin al eksterlando por serĉi lokon, kiel oni akceptus nin. Li postlasis multe da perloj kaj gemoj tre valoraj, kune kun iom da mono en kruzadoj^[418] kaj en oraj eskudoj, kaŝinte ĉion subtere en sekreta loko nur de mi konata. Li ordonis min neniapretekste tuŝi la trezoron, se okaze oni ekzilus min antaŭ lia reveno. Mi faris kiel ordonite, kaj kun miaj onkloj kaj aliaj familianoj kaj parencoj, vojaĝis al Berberio kaj de tie pasis al Alĝerio, kie mi vivis kvazaŭ en la infero mem. La reĝo sciigis pri mia belo, kaj ankaŭ la onidiroj pri mia riĉo trafis lian orelon, kio iel min favoris. Li vokis min al si, demandis de kiu regiono de Hispanio mi venis kaj kiom da juveloj kaj mono mi portas kun mi. Mi respondis, dirante al li

la nomon de mia vilaĝo, kaj aldonis, ke la juveloj kaj la mono restas tie enterigitaj, kaj ke mi povus facile repreni ilin, se mi mem revenus al Hispanio. Mi diris ĉion ĉi, kun la espero ke lia mon-avido pli efike blindigus lin ol mia belo.

»Sed, konversacianta kun mi pri ĉi aferoj, li ricevis la informon, ke unu el la plej belaj kaj graciaj junuloj imageblaj akompanis min al Alĝerio. Mi tuj komprenis, ke oni aludis la junan don Gaspar Gregorio, kies belo estis efektive nekomparebla. Mi sentis profundan alarmon ĉe la penso, ke grava danĝero minacas mian amikon, ĉar inter la barbaraj turkoj oni pli aprezas belan knabon aŭ junulon ol la plej belan virinon. La reĝo ordonis, ke oni konduku la junulon al li, demandis min, ĉu la onidiroj pri la belo de la knabo estas veraj, kaj tiam, kvazaŭ inspirita de la ĉielo, mi respondis, ke jes, sed informis lin, ke li estas, ne viro, sed virino kaj mi mem. Tuj poste mi suplikis la reĝon, ke li permesu min iri vesti ŝin per kostumo al ŝi propra, por ke ŝi brilu per sia tuta belo kaj sen embaraso. La reĝo konsentis kaj diris, ke en la sekvanta tago ni parolus, pri kiel mi povus reveni al Hispanio por repreni la kaŝitan trezoron. Mi parolis kun don Gaspar, avertis lin, ke en vira vesto li falus en grandan danĝeron, surmetis al li maŭrinan kostumon kaj en la sama vespero kondukis lin al la reĝo, kiu, lin vidante, gapis de miro kaj decidis gardi ŝin por ŝin donaci al la granda turka imperiestro. Por eviti al si mem al tenton, kaj al ŝi la danĝeron, kiu povus ŝin minaci inter la virinoj de lia haremo, la reĝo loĝigis ŝin en la domo de kelkaj sinjorinoj maŭraj de alta rango, por ke ili prizorgu kaj gardu ŝin. Oni tuj kondukis lin al la domo, kaj kion ni ambaŭ sentis (ĉar mi ne povas negi, ke mi amas lin) povus bone kompreni nur la geamantoj disirantaj unu de la alia. La reĝo decidis, ke mi revenu al Hispanio en ĉi brigantino, eskortate de la du turkoj mortigintaj viajn soldatojn. Ankaŭ ĉi hispana renegato venis kun mi (kaj ŝi montris la viron, kiu parolis la unua al la generalo) kaj mi scias tre bone, ke li estas sekrete kristano,

kaj ke li dezirus, ne reveni la Berberio, sed resti en Hispanujo. La ceteraj en la brigantino estas maŭroj kaj turkoj taŭgaj nur por remado. La du turkoj, insolentaj kaj monavidaj, ne volis obei la ricevitan ordonon meti min, kristane vestitan, en la unuan lokon trafitan de la ŝipo. Kontraŭe, ili prenis la decidon navigi laŭlonge de ĉi bordo por kapti, se eble, ian predon, ĉar ili pensis, ke, se ili min elŝipigus, mi povus esti trafita de akcidento, riveli la pozicion de la brigantino kaj endanĝerigi ĝin, se galeroj kristanaj navigus proksime.

»Hieraŭ nokte mi rimarkis ĉi bordon, sen ke ni sciis ion pri la proksimo de la kvar galeroj, kaj ili nin surprizis. Ĉion alian vi jam konas. Nu, don Gregorio, en virina kostumo, restas inter virinoj, kun evidenta danĝero por sia vivo. Kaj mi staras ĉi tie kun la manoj ligitaj, atendante, aŭ pli ĝuste, timante morti, kvankam la vivo ne plu ŝajnas al mi vivinda. Jen, sinjoroj, mia historio, tiel vera kiel senfortuna. Mi suplikas vin nur, ke vi permesu min morti kiel kristana, ĉar, kiel dirite, mi ne kulpas je la peko, en kies fundon falis mia popolo.

La knabino ĉesis tiam paroli, kaj ŝiaj okuloj, plenaj de larmoj, kortuŝis multe de ŝiaj aŭskultantoj, tiom, ke ankaŭ ili ploris. La vic-reĝo, molkora kaj kompatema, sen diri eĉ unu vorton, proksimiĝis al ŝi kaj propramane deligis la belajn manojn de la maŭrino.

Nu, dum la kristana maŭrino rakontis sian raran historion, unu olda pilgrimanto, enirinta en la galeron kun la vic-reĝo, ne deturnis de ŝi la rigardon eĉ unu momenton. Kaj apenaŭ ŝi finis sian rakonton, li ĵetis sin al ŝiaj piedoj, ilin brakumis, kaj diris inter mil ĝemoj kaj suspiroj:

—Ho Ana Félix, mia kompatinda filino! Mi estas Ricote, via patro, kaj revenis serĉi vin, ĉar mi ne povas vivi sen vi, lumo de mia animo!

Ĉe tiaj vortoj, Sancho apertis la okulojn, levis la kapon (ĝis tiam li tenis ĝin klinita, pensante pri sia akcidentoplena promonado) rigardis la pilgrimanton, rekonis la saman Ricote, kiun li trovis en la tago de sia eliro al la insulo, kaj komprenis ke tie staras lia filino. La maŭrino, jam libera de la ŝnuroj, brakumis sian patron, miksante siajn larmojn kun la liaj.

—Jen, sinjoroj, mia filino, pli kompatinda pro siaj misfortunoj ol pro sia nomo —diris Ricote al la vic-reĝo kaj al la generalo—. Ŝi havas la personan nomon Ana Félix kaj la familian Ricote, kaj famas tiel pro sia belo kiel pro mia riĉo. Mi foriris de mia vilaĝo por serĉi en la eksterlando lokon, kie ni povus sekure loĝi. Mi trovis ĝin en Germanio, revenis en ĉi pilgrima kostumo kun kelkaj germanoj por renkonti mian filinon kaj elfosi la riĉan trezoron, kiun mi kaŝis sub la tero. Mian filinon mi ne trovis. La trezoron mi trovis kaj portas ĝin kun mi, kaj nun, pro ĉi stranga koincido de cirkonstancoj, mi renkontis la trezoron plej valoran, mian karan filinon. Se ŝiaj larmoj, la miaj kaj nia manko de kulpo povas aperti pardonon al la mizerikordo tra la rigoro de via justeco, estu al ni kompataj, ĉar neniam ni intencis, eĉ en pensoj, ofendi vin, nek iel partoprenis en la komplotoj de nia prave ekzilita popolo.

—Mi bone konas Ricote —diris tiam Sancho— kaj scias, ke Ana Félix estas lia filino, kiel li asertas. Sed rilate al liaj iroj kaj venoj, bonaj aŭ mavaj intencoj kaj ĉio cetera, mi ne opinias.

Antaŭ la ĉeestantoj, mirfrapitaj de tiel stranga serio de eventoj, la generalo diris:

—Viaj larmoj ne lasos min plenumi mian ĵuron. Vivu, ĉarma Ana Félix, la jarojn al vi rezervitajn de la ĉielo, kaj pagu sian kulpon nur la insolentaj kaj aŭdacaj krimintoj.

Kaj tuj poste li ordonis pendumi de la anteno la du turkojn, kiuj mortigis la du soldatojn. Sed la vic-reĝo intervenis petante kun insisto ne pendumi ilin, ĉar pli la frenezo ol la temeraro movis ilin misfari. La generalo cedis al la peto de la vic-reĝo, ĉar fridasange oni ne bone plenumas venĝon. Tuj poste ili traktis la manieron savi don Gaspar Gregorio el ties danĝera situacio. Ricote proponis ĉi-cele nombron da perloj kaj juveloj, kiujn li havis, en la valoro de pli ol du mil dukatoj. Ili diskutis multe da projektoj, sed la plej bonan ideon prezentis la iam menciita hispana renegato: li sin proponis reiri al Alĝerio en ŝipeto de proksimume ses benkoj kun kristanaj remistoj, ĉar li sciis, kie, kiel kaj kiam li povus kaj devus elŝipiĝi, kaj same li konis la domon, kie don Gregorio sidis retenate. La vic-reĝo kaj la generalo dubis, ĉu ili devus fidi je la renegato, aŭ konfidi al li kristanajn remistojn. Sed Ana Félix garantiis por li, kaj ŝia patro Ricote diris, ke li pagus la elaĉetan monon por la kristanoj, se okaze oni ilin kaptus.

Nu, ili interkonsentis efektiviĝi ĉi projekton, la vic-reĝo elŝipiĝis, kaj don Antonio Moreno prenis kun si la maŭrinon kaj ties patron al sia domo. La vic-reĝo rekomendis lin regali kaj komplezi ilin laŭpove kaj aldonis, ke, de sia flanko, li metas je lia dispono kion en lia propra hejmo povus taŭgi por ilia regalo: tiom da bonvolo kaj karitato inspiris al la brusto de la vic-reĝo la belo de Ana Félix!

[416] Hispana vorto, laŭlitere «dorsulo»: remisto, kiu servis en la pobo de galero kaj, fronte al la ceteraj remistoj, direktis ilin, ke ili remu laŭ la sama kadenco.

[417] «toraquis» en la hispana originalo: ebriaj turkoj.

[418] Iama portugala monero ora.

Ĉapitro 64

Kie oni rakontas pri la aventuro, kiu afliktis la hidalgon don Quijote pli ol ĉiuj antaŭaj

Diras la historio, ke la edzino de don Antonio Moreno ĝoje akceptis ĉe si la junan Ana Félix. Ŝi bonvenigis la knabinon kun granda afablo, ĉarmite de ŝiaj elstaraj belo kaj inteligento; kaj el la tuta urbo, kvazaŭ vokitaj de sono sonorila, aliris homoj admiri ŝin.

Don Quijote diris al don Antonio, ke ilia projekto liberigi don Gregorio ne estas bona, ĉar ĝi ŝajnas pli danĝera ol pozitiva, kaj ke pli konvenus, se oni sendus lin al Berberio kun ties armoj kaj ĉevalo, ĉar li liberigus la junulon spite al la tuta maŭra nacio, same kiel don Gaiferos faris rilate sian edzinon Melisendra.

—Via moŝto memoru —tiam intervenis Sancho—, ke sinjoro don Gaiferos liberigis sian edzinon sur firma tero kaj prenis ŝin al Francio ankaŭ sur firma tero. Sed, se okaze ni liberigus la junan don Gregorio, ĉu ni povus preni lin en Hispanion, konsiderante, ke la maro kuŝas intere?

—Por ĉio ekzistas rimedo, se escepti la morton —respondis don Quijote—. Se ni disponus barkon proksiman al la bordo, nenio en la mondo povus bari nian enŝipiĝon.

—Via moŝto aranĝas ĉion laŭ la mezuro de viaj deziroj —diris Sancho—. Sed de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco, kaj mi pli preferas la renegaton. Li ŝajnas al mi ulo bona kaj rezoluta.

Don Antonio diris, ke, se la renegato ne sukcesus en sia entrepreno, tiam ili helpus sin per la rimedo sendi la grandan don Quijote al Berberio. Du tagojn poste, la renegato ekiris en leĝera barko kun dek du remiloj kaj tre kuraĝa ŝipanaro, kaj postu du aliaj tagoj, la galeroj forvelis al Oriento; sed antaŭe la generalo petis la vic-reĝon teni lin informata pri la eventuala liberigo de don Gregorio kaj pri la sorto de Ana Félix; kaj la vic-reĝo promesis volonte tion fari.

Nu, unu matenon, don Quijote rajde promenis sur la plaĝo, en sia armaĵo kaj kun sia tuta arsenalo, ĉar kiel li ofte diris, lia ripozo estas la bataloj, kaj liaj garnoj la bataliloj, do li ĉiam portis ilin kun si. Tiam li vidis veni ale al li kavaliron same kirasitan de la kapo ĝis la piedoj, kun la bildo de brila luno pentrita sur la ŝildo. La nekonato, proksimiĝinte sufiĉe por esti aŭdata de don Quijote, kriis al li:

—Ho vi, fama kaj neniam sufiĉe laŭdata kavaliro don Quijote de La Mancha: jen antaŭ vi la Kavaliro de la Blanka Luno, kies unikaj prodaĵoj eble igas vin memori mian nomon. Mi venas batali kontraŭ vi kaj provi la forton de via brako por devigi vin konfesi, ke mia damo, kiu ajn ŝi estas, senkompare pli belas ol via Dulcinea de El Toboso. Se vi senrezerve konfesos ĉi veron, vi evitos al vi vian propran pereon, kaj al mi la penon vin mortigi. Sed, se vi decidis batali, kaj mi venkos vin, mi postulos de vi nur tion, forlasi la armojn, ne plu serĉi aventurojn kaj retiri vin al via vilaĝo, kie vi loĝos dum unu jaro sen meti manon al glavo, en profunda paco kaj plaĉa ripozo, por la bono de via animo kaj la prospero de via bieno. Sed, se vi venkos min, vi disponos laŭvole je mia vivo; miaj armoj kaj ĉevalo apartenos al vi kiel predoj, kaj la renomo de miaj faroj transiros al via propra famo. Pensu kion vi preferas, kaj tuj respondu, ĉar nur la hodiaŭan tagon mi havas por fini ĉi aferon.

Don Quijote rigidiĝis de miro kaj konfuzo, tiel pro la aroganto de la Kavaliro de la Blanka Luno, kiel pro la motivo de la defio. Sed trankvile kaj kun serena mieno li respondis:

—Kavaliro de la Blanka Luno, pri kies faroj mi ne aŭdis ĝis nun: mi igos vin ĵuri, ke neniam vi vidis mian gloran Dulcinea, ĉar alie vi ne okupus vin per ĉi entrepreno, se konsideri, ke, admirante ŝin, vi estus konfesinta vian eraron, tial, ke belo komparebla kun la ŝia nek povis, nek povas ekzisti. Tiel do, dirante, ne ke vi mensogas, sed ke via aserto ne kongruas kun la vero, mi akceptas vian defion kun la proponitaj kondiĉoj. Kaj ĝi okazu jam nun, por ke ne pasu ĉi tago, la sola, kiun vi disponas por ĉi afero. Mi ekskludas el viaj kondiĉoj tion, ke la gloro de viaj faroj transiru al la mia, ĉar mi ne konas ilin, kaj mi kontentas je la miaj, kiaj ili estas. Elektu kiom da kampo vi deziras, kaj mi faros same, kaj «kion Dio donos, Sankta Petro benu».

De la urbo oni jam rimarkis la Kavaliron de la Blanka Luno kaj informis la vic-reĝon, ke la nekonato parolas kun don Quijote. La vic-reĝo supozis, ke temas por nova aventuro elpensita de don Antonio aŭ de alia kavaliro de la urbo, do li tuj rajdis sur la plaĝon kun don Antonio kaj multaj aliaj kavaliroj, ĝuste en la momento kiam don Quijote turnis la ĉevalon per la brido por preni la terenon necesan por la atako. Vidante, ke ambaŭ viroj pretas impeti unu la alian, la vic-reĝo intermetis sin kaj demandis al ili la kialon de ilia subita duelo. La Kavaliro de la Blanka Luno respondis, ke temas pri afero de rangordo de belulinoj kaj koncize informis lin pri sia defio al don Quijote, kaj pri tio, ke ambaŭ partioj akceptis la kondiĉojn de la duelo. La vic-reĝo proksimiĝis tiam al don Antonio kaj softe lin demandis, ĉu li konas ĉi kavaliron de la Blanka Luno, aŭ ĉu oni aranĝis novan mistifikon kontraŭ don Quijote. Don Antonio respondis, ke li nek konas la kavaliron, nek scias, ĉu la defion oni prenu ŝerce aŭ serioze. Ĉi respondo lasis la vic-reĝon perpleksa, kaj

li hezitis, ĉu permesi aŭ ne la duelon. Fine li ne povis ne kredi, ke temas pri ĝuste alia mistifiko, do li apartiĝis dirante:

—Sinjoroj kavaliroj, se ĉi tie ne ekzistas alia solvo ol konfesi aŭ morti; se don Quijote de La Mancha teniĝas al sia opinio, kaj ankaŭ la Kavaliro de La Blanka Luno ne cedas, tiam ni lasu la aferon en la manojn de Dio. La kampon al vi!

La Kavaliro de la Blanka Luno dankis per diskretaj kaj ĝentilaj vortoj la vic-reĝon pro ties permeso, kaj same faris don Quijote. Ĉi-lastata tutkore sin rekomendis al la ĉielo kaj al sia Dulcinea (kiel li kutimis ĉe la komenco de la bataloj), okupis iom pli da tereno, ĉar li vidis sian kontraŭulon fari la saman manovron, kaj, sen ke oni blovus per trumpeto aŭ alia milita instrumento la atak-signalon, la duelantoj samtempe komencis la galopadon. Sed tial, ke la ĉevalo de la Kavaliro de la Blanka Luno estis pli rapida, li renkontis la hidalgon ĉe la du trionoj de la kurejo kaj tiel impete li koliziis kontraŭ lin —sen tuŝi lin per la lanco, ĉar ŝajne li intence ne levis ĝin—, ke don Quijote kaj Rocinante renversiĝis teren en terura falo. Poste la venkinto tuj saltis al la hidalgo, metis la pinton de la lanco sur lia viziero kaj diris:

—Venkinta vi estas, kavaliro, kaj eĉ mortos, se vi ne konfesos laŭ la kondiĉoj de nia defio.

Don Quijote, muelita kaj duonsvena, sen levi la vizieron, diris kun trema voĉeto, kvazaŭ li parolus de la interno de tombo:

—Dulcinea de El Toboso estas la plej bela virino de la mondo, kaj mi la plej senfortuna kavaliro. Sed mi ne povas konsenti, ke mia venkiteco perfidu tian veron. Puŝu kavaliro, vian lancon, kaj prenu de mi la vivon, tial, ke vi jam prenis mian honoron.

—Tion mi tute ne faros —respondis la Kavaliro de la Blanka Luno—. Longe vivu en sia senmakula renomo la belo de sinjorino Dulcinea de El Toboso. Sufiĉas al mi, ke la granda don Quijote de La Mancha restu en sia vilaĝo dum unu jaro, aŭ pli longe, laŭ mia volo, kiel ni interkonsentis antaŭ ol ni komencis batali.

i

La vic-reĝo, don Antonio kaj multaj aliaj personoj tie troviĝantaj aŭskultis ĉi vortojn de la venkinto, kaj same aŭskultis la hidalgon respondi, ke, se nur oni ne petus de li ion diskreditan al la famo de Dulcinea, li plenumus ĉion alian, kiel vera kaj skrupula kavaliro. Aŭdinte ĉi konfeson, la Kavaliro de la Blanka Luno deturnis la ĉevalon per la brido, klinis la kapon antaŭ la vic-reĝo en signo de respekto kaj duongalope rajdis en la urbon. La vic-reĝo ordonis don Antonio sekvi lin kaj eltrovi ĉiakoste, kiu li estas. Poste oni starigis la hidalgon, levis lian vizieron, kaj montriĝis lia vizaĝo, pala kaj ŝvitoplena. Rocinante ne povis sin movi dum kelka tempo: en tiel mava stato lasis lin la forto de la falo! Sancho, afliktita kaj senkonsola, ne sciis kion diri aŭ fari, ĉar ŝajnis al li, ke la ĵusa epizodo okazis en sonĝo, kaj ke la tuta afero disvolviĝis en magia atmosfero. Li vidis sian mastron venkita kaj devigita ne preni la armojn dum unu jaro; imagis stompita la gloran brilon de liaj prodaĵoj; kaj kion li esperis el la novaj promesoj de don Quijote, tio svenis kiel fumo dispelita de la vento. Li timis, ĉu Rocinante suferus konstantan kriplon, aŭ ĉu lia mastro resaniĝus de sia frenezo; kvankam li pensis, ke, vere, estus bone, se don Quijote retrovus la prudenton. Fine en porto-seĝo (la vic-reĝo antaŭe sendis por ĝi) oni kondukis la hidalgon en la urbon, kaj ankaŭ la vic-reĝo rajdis tien kun la deziro scii pri la Kavaliro de la Blanka Luno, kiu lasis la hidalgon en tiel lamentinda stato.

Ĉapitro 65

Kie oni informas pri la Kavaliro de la Blanka Luno, pri la liberigo de don Gregorio kaj pri aliaj eventoj

Don Antonio Moreno sekvis la Kavaliron de la Blanka Luno, kaj ankaŭ svarmo da buboj sekvis, eĉ persekutis lin, ĝis li rifuĝis en gastejon de la centro de la urbo. Don Antonio eniris tien kun la deziro lin koni. Aperis ŝildisto por akcepti la Kavaliron de la Blanka Luno, kaj demeti ties armaĵon, sed la Kavaliro pasis en alian ĉambron kaj, kun li, don Antonio, kiu tre senpaciencis scii pri lia persono. La venkinto de don Quijote, vidante, ke la alia ne havas intencon lasi lin en paco, diris:

—Mi bone scias, sinjoro, kion vi deziras: vi volas eltrovi, kiu mi estas. Nu, tial, ke mi havas nenian motivon kaŝi antaŭ vi mian identecon, mi ĝin rivelos al vi, sen devii eĉ unu colon de la vero, dum mia servisto demetas de mi la armaĵon. Sciu, sinjoro, ke oni nomas min bakalaŭro Sansón Carrasco. Mi estas samvilaĝano de don Quijote, kies absurdoj kaj ekstravagancoj ekscitas la kompaton de liaj konatoj. Lia sorto aparte min afliktas, kaj tial, ke mi kredas, ke li resaniĝus, se li trankvile vivus en sia lando kaj en sia hejmo, mi kovis planon por sendi lin al ties vilaĝo, kaj lin reteni tie. Nu, antaŭ proksimume tri monatoj, alivestita kiel vaganta kavaliro kaj sub la nomo de Kavaliro de la Speguloj, mi ekiris serĉi lin sur la vojoj kun la intenco batali kontraŭ li, kaj venki lin sen fari al li damaĝon, sed metante kiel kondiĉon, ke la venkito submetiĝu al la deziroj de la venkinto. Kaj mi pensis devigi lin (ĉar mi anticipe konsideris lin venkita) reiri al sia vilaĝo kaj resti tie dum unu jaro, en kies tempo li povus resaniĝi. Sed la fato ordonis alion, ĉar li venkis min, ĵetis min

de sur la ĉevalo, kaj mia plano do fiaskis. Li daŭrigis sian vojon, kaj mi reiris hejmen kapklina, plena de honto kaj disbatita pro la rigoro de la falo. Tamen mi ne rezignis mian projekton serĉi lin denove kaj venki lin, kio hodiaŭ okazis. Kaj ĉar li tiel konscience obeas la regulojn de la kavalirismo, certe li plenumos sian vorton. Tio, sinjoro, estas la tuta historio, kaj mi havas nenion plian por diri. Mi suplikas vin ne riveli mian personecon al don Quijote, por ke mia ideo ĝisfine realiĝu, kaj tiel povu retrovi sian racion la hidalgo, homo tre saĝa kiam la idiotaĵoj de la kavalirismo ne perturbas lian menson.

—Ho, sinjoro! —diris don Antonio—. Dio pardonu vin, ĉar vi faras grandan damaĝon al la homoj, klopodante rehavigi la saĝon al la plej amuza frenezulo de la mondo. Ĉu vi ne vidas, sinjoro, ke la eventuala bono, kiu kaŭzus lia prudentiĝo, tute ne egalus al plezuro, kiun faras al ni liaj ekstravagancoj? Sed mi pensas, sinjoro bakalaŭro, ke via tuta talento ne sukcesos igi saĝa homon tiel absolute frenezan. Kaj se tio ne estus peko kontraŭ la kristana karitato, mi dezirus, ke don Quijote neniam resaniĝu, ĉar kun lia sano ni perdus, ne nur lian drolan spiriton sed ankaŭ la humuron de lia ŝildisto Sancho, ambaŭ kapablaj inspiri ĝojon al la melankolio mem. Malgraŭe, mi silentos kaj gardos la sekreton por vidi, ĉu mi ne eraras, pesante, ke viaj klopodoj, sinjoro bakalaŭro, tute vanos.

Carrasco respondis, ke ĉiuokaze, la afero bone iras, kaj ke li esperas meti al ĝi sukcesan finon. Poste ili adiaŭis unu la alian kun ĝentilaj kaj komplimentaj vortoj; Carrasco igis ŝarĝi mulon per la kunligitaj pecoj de lia armaĵo, surgrimpis la ĉevalon, kiun li uzis en la duelo, kaj forlasis la urbon en la sama tago ale al la hejmo, sen ke survoje okazus al li io rakontinda en ĉi vera historio. Don Antonio ripetis al la vic-reĝo la vortojn de Carrasco, ĉe kio la vic-reĝo ne montris multe da ĝojo, ĉar la ekzilo de don Quijote markus la finon

de la amuzo provizita ĝis nun de liaj ekstravagancaj entreprenoj.

Afliktita, morna, profunde en pensoj kaj kun muelita korpo, don Quijote kuŝis en la lito dum ses tagoj, kaj senĉese volvis kaj revolvis en sia kapo la misfortunon de sia venkiteco. Sancho konsolis lin, dirante interalie:

—Sinjoro, levu la kapon kaj, se vi povas, ĝoju kaj danku la ĉielon, ĉar, kvankam oni ĵetis vin surteren, vi ne havas eĉ unu ripo rompita. Vi scias, ke kiam oni donas, oni ankaŭ ricevas, kaj ke ne ĉiam pendas ŝinkoj sur la hokoj. Sendu promeni la kuraciston, ĉar vi ne bezonas lin por la flegado de via malsano. Ni revenu hejmen kaj ne plu vagadu serĉante aventurojn tra landoj kaj lokoj nekonataj. Nu, bone pensante, evidentas, ke, kvankam via moŝto troviĝas en pli mava stato ol mi, mi estas la pli granda perdanto en ĉi afero, ĉar, kiam mi forlasis mian gubernatoran postenon, mi samtempe forlasis ĉiam deziron plu esti gubernatoro, sed ne la deziron fariĝi grafo. Kaj tian rangon mi neniam akiros, se vi forlasos vian kavaliran profesion: se vi perdos la ŝancon sidi en reĝa trono, miaj espero turniĝos en fumon.

—Silentu, Sancho. Memoru, ke miaj retiriteco kaj izolo daŭros ne pli ol unu jaron. Poste mi revenos al mia glora ofico, kaj tiam ne mankos al mi la okazo konkeri la regnon aŭ disponi graflandon por ĝin donaci al vi.

—Dio vin aŭskultu —diris Sancho— kaj la peko estu surda. Mi ĉiam aŭdis, ke pli valoras bona espero ol mizera havo.

Ĉe tio eniris don Antonio kaj, kun montroj de granda ĝojo, interrompis ilian konversacion, dirante:

—Bonan novaĵon, sinjoro don Quijote! Don Gregorio, kaj la renegato irinta serĉi lin, troviĝas ĉe la haveno. Nu, ne jam ĉe

la haveno, sed en la hejmo de la vic-reĝo. Baldaŭ ili venos ĉi tien.

Don Quijote iom ĝojis ĉe la sciigo kaj diris:

—Verdire, mi preskaŭ preferintus vidi la entreprenon fiaski, ĉar tiel mi sentus min devigita iri al Berbereio, kie, per la forto de mia brako mi liberigus ne nur don Gregorion, sed eĉ la tutan nombron da kristanoj tie tenataj kiel kaptitoj. Sed, ve al mi! Kion mi diras? Ĉu mi ne estas la venkito? Ĉu oni ne ĵetis min surteren kaj prohibis al mi preni la armojn dum unu jaro? Kial do mi promesas? Pri kio vantas, se prefere ol glavon mi devus uzi ŝpin-radon?

—Sufiĉe jam, sinjoro! —diris Sancho—. Plu vivu la kokino eĉ kun sia pipso. Hodiaŭ estas via vico, morgaŭ povus esti mia. Ne valoras tro zorgi pri ĉi batoj kaj bataloj, ĉar la falinta nun, povas levi sin morgaŭ, kondiĉe, ke li ne volas resti en la lito: mi volas diri, se, anstataŭ perdi la kuraĝon, li preferus reakiri forton por denove batali. Kaj nun, via moŝto leviĝu por akcepti don Gregorion: la domanoj komencas ekscite movi sin, do li certe troviĝas jam ĉi tie.

Kaj li pravis, ĉar don Gregorio kaj la renegato jam raportis al la vic-reĝo pri la incidentoj de sia vojaĝo, kaj la junulo, en sia urĝo renkonti Ana Félix, iris kun sia kompano al don Antonio. Kiam oni lin elprenis el Alĝerio, don Gregorio portis ankoraŭ virinan kostumon, sed en la ŝipo li ŝanĝis ĝin kontraŭ la vesto de kaptito eskapinta kun li. Tamen, pro sia eksterordinara belo, li vekus en ajna kostumo admiron, amon kaj envion, kaj aĝis ŝajne inter dek sep kaj dek ok jaroj. Ricote kaj lia filino eliris ilin bonvenigi: la patro plorante, kaj Ana Félix sinretene. Ili ne brakumis unu la alian, ĉar granda amo ĉiam inklinas manifestiĝi per sobraj elmontroj. La du geamantoj parolis inter si per sia silento, kaj nur iliaj okuloj rivelis la feliĉon kaj la honeston de iliaj pensoj. La renegato

rakontis pri la rimedoj kaj ruzoj uzitaj por la liberigo de don Gregorio. Poste don Gregorio parolis pri la danĝeroj kaj komplikoj lin sieĝintaj en la haremo, kun kies virinoj li kunvivis, kaj lia rakonto, ne longa, sed konciza, montris lin pli matura laŭsaĝe ol laŭaĝe. Fine, Ricote pagis malavare al la renegato kaj al liaj remistoj. La renegato eniris denove en la sinon de la Eklezio kaj ĉesis esti ĝia putra membro dank' al siaj kontricio kaj pentofarado. Du tagojn poste, la vic-reĝo traktis kun don Antonio pri kiel oni povus aranĝi, ke Ana Félix kaj ŝia patro restu en Hispanio; ĉar ŝajnis al li, ke filino tiel kristana kaj patro ŝajne tiel bon-intenca devus ricevi la permeson plu loĝi en la lando. Don Antonio sin proponis fari la necesajn elpaŝojn en la ĉef-urbo, kien nepre li vojaĝus por trakti aliajn aferojn, kaj duonaludis, ke en la kortego oni atingas multon, eĉ malfacilan, per favoroj kaj donacoj.

—Oni nenion esperu el favoroj kaj donacoj —diris tiam Ricote, kiu ĉeestis ĉi konversacion—, ĉar preĝoj, promesoj, donacoj aŭ larmoj ne havas influon sur la eminenta don Bernardino de Velasco, grafo de Salazar, komisiita de Lia Majesto zorgi pri la plenumo de la ekzil-dekreto. Verdire, li scias mildigi per mizerikordo la rigoron de la justeco, sed vidante, ke la tuta korpo de mia popolo suferas infekton kaj putron, li aplikis al ĝi ardan kaŭteron, ne moligan unĝventon. Kaj tiel, helpante sin per prudento, sagaco, diligento, kaj ankaŭ per teroro, li portis sur siaj fortaj ŝultroj la pezon de ĉi granda entrepreno kaj ĝin plenumis ĝisfine, sen ke niaj artifiko, ruzoj, manovroj, trompoj kaj suplikoj povus blindigi liajn Argusajn okulojn. Li ĉiam tenis ilin apertaj, por ke eĉ ne unu homo el nia popolo plu loĝu ĉi tie aŭ restu kaŝita, kiel subtera radiko kapabla reĝermi kaj doni venenajn fruktojn en Hispanio, lando jam pura, jam libera de la timo, kiun la granda nombro da mudeharoj inspiris al la regno. Heroa decido de la eminenta Filipo la 3-a! Kaj tiel saĝe li kondukis, konfidante tian entreprenon al don Bernardino de Velasco!

—Tamen —diris don Antonio—, kiam mi estos en la ĉefurbo, mi faros ĉian elpaŝon eblan, kaj la ceteron ni lasu al la providenco. Don Gregorio venos kun mi, ke li mildigu la doloron, kiun liaj gepatroj certe sentas pro lia foresto. Ana Félix restos kun mia edzino ĉe mi, aŭ en iu monaĥinejo, kaj mi scias, ke la vic-reĝo ĝojos teni ĉe si la bonan Ricote, ĝis ni vidos, kio rezultos el miaj elpaŝoj.

La vic-reĝo konsentis ĉion proponitan de don Antonio, sed, kiam don Gregorio eksciis pri la aranĝoj, li deklaris, ke li nek volas, nek povas lasi sola doña Ana Félix. Fine ankaŭ li akceptis la planon, ĉar li pensis, ke, vidinte siajn gepatrojn, li trovus la manieron reveni al ŝi. Tiel do Ana Félix restis kun la edzino de don Antonio, kaj Ricote ĉe la vic-reĝo.

Venis la tago de la vojaĝo de don Antonio; du tagojn poste foriris don Quijote kaj Sancho, ĉar la sekvoj de la falo de la hidalgo ne permesis lin elrajdi pli frue. Larmoj, suspiroj ĝemoj kaj svenoj abundis en la adiaŭo inter don Gregorio kaj Ana Félix. Ricote proponis al don Gregorio la sumon de mil eskudoj, se li ilin dezirus. Sed la junulo rifuzis, kaj prenis prunte de don Antonio nur kvin, kun la promeso ilin redoni en la ĉefurbo. Ĉe tio ankaŭ li foriris, kaj poste, kiel dirite, don Quijote kaj Sancho: don Quijote sen armoj kaj en vojaĝa vesto; Sancho piede, ĉar la azeno portis la pecojn de la armaĵo kaj la ceteran arsenalon.

Ĉapitro 66

Kie oni traktas pri tio, kion la leganto vidos, aŭ la aŭskultanto aŭdos

Kiam don Quijote kaj Sancho eliris el Barcelona, la hidalgo denove rigardis la lokon, kie li falis, kaj diris:

—Ĉi tie pereis Trojo. Ĉi tie, ne mia timemo, sed mia misfortuno, rabis de mi la gloron, kiun mi konkeris. Ĉi tie la fato sin ekzercis kontraŭ min per siaj ŝanĝoj kaj turniĝoj. Ĉi tie miaj faroj eklipsiĝis. Fine, ĉi tie falis mia sorto kaj ne leviĝos plu.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Kuraĝaj koroj devas tiel same pacienci en la misfortuno, kiel ĝoji en la prospero. Tion mi mem spertas, ĉar, se mi kontentis en mia gubernatora posteno, nun, kiel piedira ŝildisto, mi ne tristas: ĉar mi aŭdis diri, ke la tiel nomata Fortuno estas virino ebria kaj kapricema, kaj ĉefe blinda, do ŝi ne vidas kion ŝi faras kaj ne scias, kiun ŝi levas, kaj kiun ŝi renversas.

—Vi tre saĝumas, Sancho, kaj diskrete parolas —diris don Quijote—. Vere, mi ne scias, de kiu vi lernas. Mi povas nur diri al vi, ke en la mondo ne ekzistas tia Fortuno, kaj ke la eventoj, bonaj aŭ mavaj, okazas, ne hazarde, sed pro speciala providenco de la ĉielo, kaj de tio venas la diro, ke ĉiu persono konstruas al si sian propran destinon. Mi konstruis la mian sen la necesa prudento, kaj tial, mia troa sinfido kondukis min al mava fino: ĉar mi devintus pensi, ke la feblo de mia Rocinante ne povus rezisti la potencon kaj la grandon de la ĉevalo de la Kavaliro de la Blanka Luno. Malgraŭ ĉio mi riskis min, farante kiom mi povis, kaj, kvankam mi perdis la honoron, mi nek perdis nek povas

perdi la virton plenumi mian vorton. Kiam mi estis aŭdaca kaj kuraĝa kavaliro vaganta, la forto de miaj brakoj kreditigis miajn farojn. Nun, kiam mi iras surpiede, kiel ŝildisto, mi kreditigos miajn vortojn, plenumante mian promeson. Plu marŝu, amiko Sancho, kaj ni iru pasigi en nia vilaĝo la jaron da ekzilo, kaj en nia izoliteco mi rekiros novan forton por reveni al la profesio de la armoj, kiun mi ne povas forgesi.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Marŝi piede ne estas tiel agrabla afero, ke oni sentu la deziron fari longajn irojn. Ni lasu ĉi armojn alkroĉitaj al la branĉo de arbo, ke ili ŝajnu pendumitoj: tiam, mi povos sidi sur la azeno kaj, kun la piedoj for de la tero, ni faros la irojn tiel longaj, kiel plaĉos al vi. Sed, se vi imagas, ke mi povas vojaĝi piede per longaj etapoj, vi imagas ion neeblan.

—Vi pravas, Sancho —diris don Quijote—. Ni pendigu miajn armojn kiel trofeon, kaj sub ili, aŭ ie proksime, ni gravuru sur la arboj la enskribon, kiun portis la trofeo de la armoj de Rolando:

Ilin ne movi,
se vi ne povas
Rolandon provi.

—Vi bele parolis, sinjoro —respondis Sancho—. Kaj se ne pro tio, ke Rocinante estas al ni necesa survoje, ankaŭ ĝi devus pendi.

—Nek la armoj, nek la ĉevalo pendu! Por ke oni ne diru, ke «por bona servo, mava rekompenco».

—Via moŝto tute pravas —respondis Sancho—, ĉar, laŭ opinias la diskretaj, oni ne devas imputi al la ŝarĝo-selo la kulpon de la azeno. Tiel do, se konsideri, ke via moŝto kulpas pri ĉi afero, vi mem devus puni vin kaj ne elverŝi vian koleron kontraŭ la jam sangaj kaj rompitaĵoj armoj, kontraŭ la

milda Rocinante aŭ kontraŭ la molo de miaj piedoj, se vi postulas, ke ili marŝu pli longe ol ili povas.

Per ĉi konversacioj kaj argumentoj ili pasigis la tutan tagon, kaj eĉ la kvar sekvajn, sen trovi sur la vojo ian haltigan incidenton. Sed en la kvina tago, enirante en vilaĝon, ili renkontis ĉe la pordo de gastejo multe da homoj sin amuzantaj, ĉar estis festa tago. Kiam don Quijote kaj Sancho proksimiĝis al ili, unu kampulo diris laŭte:

—Unu el ĉi du sinjoroj, kiuj tute ne konas la partiojn, diros kion oni faru rilate al nia veto.

—Tre volonte —respondis don Quijote— kaj tute senpartiece, se mi komprenos, pri kio temas.

—Nu bone, okazas, sinjoro —diris la kampulo—, ke ĉi-vilaĝa viro, tiel grasa ke li pezas dek unu arobojn, defiis alian vilaĝanon, kun ne pli ol kvin aroboj da pezo, vetkuri kun li cent paŝojn, kondiĉe, ke ĉiu havu la saman pezon. Oni demandis al la defianto, kiel oni devus egaligi la pezon, kaj li respondis, ke tial, ke la defianto pezas kvin arobojn, li devus ŝarĝi sin per ses aroboj da fero, kaj tiel egaliĝus la dek unu aroboj de la grasa kun la dek unu de la minca.

—Ho ne, ne tiel! —kriis Sancho, antaŭ ol don Quijote respondus—. Kiel la tuta mondo scias, antaŭ ne longe mi ĉesis esti gubernatoro kaj juĝisto, do al mi apartenas klarigi ĉian dubon kaj doni mian opinion en ĉi afero.

—Respondu laŭvole —diris don Quijote—, ĉar regas en mia spirito tiel profunda agito kaj konfuzo, ke mi ne havas humoron eĉ por levi la etan fingron.

Kun ĉi permeso, Sancho sin turnis al la kampuloj, kiuj lin ĉirkaŭis kaj kun aperta buŝo streĉe atendis lian opinion, kaj diris:

—Fratoj, la postulo de la grasa homo estas absurda kaj havas eĉ ne ombbron de justeco: ĉar se, laŭdire, la defianto rajtas elekti la armilon, li ne devas elekti ĝin tia, ke ĝi ĝenu lin kaj nebligigu al li la triumfon. Sekve mi konsilas, ke la grasa defianto tranĉu, tondu, ŝiru, skrapu kaj fajlu en sia korpo (kaj li mem decidu en kiuj partoj) ĝis elimino de ses aroboj de lia karno. Tiamaniere, kun la restantaj kvin aroboj li egaliĝos al la kvin de sia kontraŭulo, kaj ili povos kuri en la samaj kondiĉoj.

—Je Dio, ĉi sinjoro parolis kiel sanktulo kaj juĝis kiel kanoniko —diris unu el la aŭskultantaj kamparanoj—. Sed certe la grasa ne volos depreni de si eĉ unu uncon de sia karno, des malpli ses arobojn.

—Plej bone se, fine, ili ne kurus —komentis alia—. Tiel la ŝarĝo ne krevigus la mincan homon, kaj la grasa ne senkarnigus sin. Do, mi proponas, ke oni aĉetu vinon per la duono de la vet-mono, kaj ke oni konduku ĉi sinjorojn al la pli bona taverno, ke ili drinku laŭplaĉe. Mi ne mankus tie...

—Mi dankas vin, sinjoroj —respondis don Quijote—. Sed mi ne povas halti eĉ unu momenton, ĉar afliktaj pensoj kaj lamentindaj eventoj devigas min ŝajni neĝentila kaj haste vojaĝi.

Tuj poste li spronis la ĉevalon kaj forrajdis, dum la kampuloj miris je lia stranga figuro, kaj je la saĝo de lia servisto, ĉar ili opiniis, ke Sancho estas tio.

—Se la servisto havas tiom da saĝo, imagu kiom da ĝi certe posedas lia mastro! —diris alia kampulo—. Mi vetas, ke se ili irus studi ĉe la universitato de Salamanca, ili fariĝus tribunalaj juĝistoj en la daŭro de palpebrumo. Jes, la afero estas studi kaj studi, kaj havi favoron kaj bonan sorton: tiam,

plej neatendite, oni vidas sin kun la vergo de juĝisto en la mano aŭ kun la mitro de episkopo sur la kapo.

La mastro kaj la servisto tranoktis meze de la kamparo, sub la libera ĉielo. Kaj en la sekvanta tago, kiam ili denove iris survoje, ili vidis alproksimiĝi viron surpiedan, kun dusako sur la ŝultroj kaj kun speco de lanco en la mano, t.e. li havis la tutan aspekton de kuriero. Kiam li pli alproksimiĝis al don Quijote, li akcelis siajn paŝojn, duonkure atingis la hidalgon, ĉirkaŭpremis lian dekstran femuron, ĉar pli alten li ne povis, kaj diris kun elmontroj de granda ĝojo:

—Ho, mia sinjoro don Quijote de La Mancha, kian grandan plezuron ricevos en sia koro mia sinjoro la duko, kiam li scios, ke via moŝto iras revene al lia kastelo, kie li loĝas ankoraŭ kun mia sinjorino la dukino!

-Mi ne rekonas vin, amiko —respondis don Quijote—. Do, diru, kiu vi estas, por ke mi sciu.

—Sinjoro don Quijote —diris la kuriero—, mi estas Tosilos, la lakeo de mia sinjoro la duko: mi ne volis batali kontraŭ via moŝto rilate al la afero de la edziniĝo de la filino de doña Rodríguez.

—Dio laŭdatu! —kriis don Quijote—. Ĉu eble vi estas la viro, kiun miaj malamikoj la sorĉistoj transformis en la lakeon de vi menciitan, por rabi de mi la honoron de la venko?

—Bonvolu ne daŭrigi, sinjoro —respondis la kuriero—, ĉar ekzistis nek ensorĉo, nek transformo de vizaĝo. Kiam mi enpaŝis en la duel-kampon mi estis la lakeo Tosilos, ĝuste la sama lakeo Tosilos poste elirinta el ĝi. Mi deziris edziĝi sen batali, ĉar la knabino plaĉis al mi. Sed mia plano finiĝis tute alie: tuj kiam via moŝto foriris de la kastelo, mia sinjoro la duko ordonis regali min per tricent vergoj, ĉar mi ne obeis liajn ordonojn rilate al mia rolo en la duelo. Nu, el ĉio ĉi

rezultis, ke la knabino jam monaĥiniĝis, kaj doña Rodríguez reiris al Kastilio. Kaj mi iras nun al Barcelona por transdoni al la vic-reĝo kelke da leteroj de mia mastro. Se via moŝto deziras trinkon de vino pura, kvankam varmeta, mi portas kun mi kalabason plenan de la plej bona, kaj krome, mi ne scias kiom da tranĉoj de fromaĝo de Tronchón, kapablaj stimuli kaj vekigi la soifon, se okaze ĝi dormus.

—Mi ŝatas la inviton —diris Sancho—. Ne plu perdu la tempon per komplimentoj, kara Tosilos, kaj jam komencu verŝi, spite al ĉiuj sorĉistoj de la mondo.

—Nu, Sancho, vi estas la ulo plej glutema sur la tero —diris don Quijote— kaj ankaŭ la plej simpla, se vi ne komprenis ankoraŭ, ke ĉi kuriero estas ensorĉita, kaj ĉi Tosilos falsa. Restu kun li kaj ŝtopu vin. Mi plu iros lantapaŝe, atendente vin.

La lakeo ridis, elingis la kalabason, prenis el la dusako la tranĉojn de fromaĝo kaj panon, sidiĝis kun Sancho sur la verda herbo, kaj ambaŭ, en paco kaj konkordo kiel bonaj amikoj, konsumis la provizon de la dusako ĝis la lasta ero, kun tiom da entuziasmo, ke ili eĉ lekis la kovertojn de la leteroj, ĉar ili odoris je fromaĝo.

—Sendube, amiko Sancho, via mastro ŝuldas al sia frenezo ĉion, kio okazas al li.

—Ŝuldi? —respondis Sancho—. Li ŝuldas neniom al ajna persono, ĉion li pagas, ĉefe tie, kie oni pagas per frenezo. Mi vidas tion klare, kaj tion mi diras al li, sed vane..., des pli, nun, ĉar li iras tute deprimita, post ol lin venkis la Kavaliro de la Blanka Luno.

Tosilos petis lin rakonti la eventon, sed Sancho respondis, ke estus neĝentile igi sian mastron atendi, kaj ke en alia tago, se ili denove renkontus unu la alian, li komplezus lin. Sancho

stariĝis, forskuis la panerojn de la barbo kaj de la saĵo, prenis la kondukilojn de la azeno, diris adiaŭ al Tosilos kaj atingis sian mastron, kiu atendis lin en la ombro de arbo.

Ĉapitro 67

Pri la decido de don Quijote fariĝi paŝtisto kaj vivi la vivon kamparanan dum la jaro de sia ekzilo, kaj pri aliaj okazaĵoj vere bonaj kaj agrablaj

Se la menson de don Quijote perturbis multe da pensoj antaŭ ol okazis lia renverso, la saman perturbon, sed multe pli intensan li suferis poste. Kiel dirite, li atendis en la ombro de arbo, kaj tien, kiel muŝoj al la mielo, iris kaj pikis lin la pensoj. Kelkaj tiaj pensoj koncernis la elsorĉon de Dulcinea; aliaj, kian vivon li vivus en la retiriteco al li altrudita. Tiam Sancho alvenis kaj komencis laŭdi la donaceman spiriton de la lakeo Tosilos.

—Ĉu eble vi pensas ankoraŭ, Sancho, ke li estas vera lakeo? —diris don Quijote—. Ŝajne vi jam forgesis, ke vi vidis Dulcinean transformita en kampulinon, kaj la Kavaliron de la Speguloj en la bakalaŭron Carrasco, kaj tion faris la sorĉistoj malamikoj miaj. Sed diru, ĉu vi demandis al Tosilos, kiel vi lin nomas, pri la sorto de Altisidora? Ĉu ŝi priploras mian foreston? Ĉu eble ŝi jam formetis en la arĥivon de forgeso la aman deziron, kiu ŝin torturis, kiam ŝi vidis min?

—Mi zorgis pri aliaj aferoj, kaj ili ne lasis al mi tempon okupi min per bagateloj. Je la ĉielo, sinjoro! Ĉu vi troviĝas nun en tia stato, ke vi volas informiĝi rilate al deziroj, ĉefe amaj, de aliaj personoj?

—Aŭskultu, Sancho —diris don Quijote—. Inter la agoj faritaj pro amo kaj la agoj faritaj pro dankemo kuŝas granda diferenco. Povas okazi, ke kavaliro ne sentas amon. Sed nepre li devas ne esti sendanka. Ŝajne Altisidora tre amis

min, donis al mi la poŝtukojn (vi ilin konas), ploris ĉe mia foriro kaj, senrigarde al la pudoro, riproĉis, insultis kaj ofendis min publike, kio montras, ke ŝi adoris min, ĉar la kolero de la geamantoj konsumiĝas per tiaj skoldoj. Mi rezervis al ŝi nenian esperon aŭ trezoron: miaj esperoj plene apartenas al Dulcinea, kaj la trezoroj de la vagantaj kavaliroj estas ŝajnaj kaj fikciaj, kiel la oroj de la feoj. Mi povas dediĉi al Altisidora nur mian penson, sed sen fari per tio damaĝon al mia konstanta memoro pri Dulcinea, kies personon vi ofendas per ia prokrasto skurĝi kaj puni karnon (la lupoj ĝin devoru!) kiun vi preferas konservi por la vermoj, anstataŭ uzi ĝin kiel rimedon por la savo de la povra sinjorino!

—Sinjoro —respondis Sancho—. Se diri la veron, mi ne povas persvadi min, ke la vipado de mia pugo havas ion komunan kun la elsorĉo de ensorĉitoj. Kvazaŭ oni dirus: «se via kapo doloras, ŝmiru unĝventon sur via genuo». Mi kuraĝus ĵuri, ke nenie en viaj libroj kavalirismaj vi legis ion rilate al elsorĉo per vipado. Nu, kiel ajn estas la afero, mi vipos min, sed kiam plaĉos al mi, kaj kiam mi disponos sufiĉan tempon por puni min senĝene.

—Dio volu —diris don Quijote—, kaj la ĉielo donu al vi la gracon sufiĉan, ke vi komprenu vian devon kaj responson helpi mian sinjorinon, kiu estas ankaŭ via, ĉar vi estas mia servisto.

Tiel parolante, ili daŭrigis sian vojaĝon, ĝis ili alvenis al la loko, kie iam la taŭroj renversis kaj tretis ilin. Don Quijote rekonis la lokon kaj diris:

—Jen la kampo, kie ni renkontiĝis kun la belaj paŝtistinoj kaj la bravaj paŝtistoj, kiuj deziris revivigi kaj imiti la legendan Arkadion. Ilia projekto ŝajnas tiel originala kaj saĝa, ke, se vi same opinias, ho Sancho!, ni devus fari same kaj vivi kiel paŝtistoj la tempon de mia ekzilo. Mi aĉetos nombron da

Ŝafinoj kaj ĉion necesan por la paŝtista ofico, kaj donos al mi la nomon paŝtisto Quijotiz. Vi nomiĝos paŝtisto Pancino, kaj ni kune vagos sur montoj, sur herbejoj kaj tra arbaroj, kantante ie, suspirante pretere, trinkante el la likvaj kristaloj de la fontoj, aŭ el la puraj rojoj kaj akv-abundaj riveroj. La kork-arboj riĉe provizos nin per siaj dolĉegaj fruktoj; la trunkoj de la duraj kverkoj per sidlokoj; la salikoj per ombro; la rozoj perodoro; la vastaj herbejoj per tapiŝoj de mil miksitaj koloroj; la aero per zefiroj mildaj kaj karesaj; la luno kaj la steloj per helo, malgraŭ la obskuro de la nokto; la kantoj per plezuro; la ploro per ĝojo; Apolono per versoj; kaj la amo per inspiro kapabla doni al ni famon, ne nur en la nuna epoko, sed en la futuraj tempoj.

—Je Dio! —kriis Sancho—. Tia vivmaniero vere logas kaj ravas min! Des pli, ke tuj kiam la bakalaŭro Sansón kaj la barbiro majstro Nicolás vidos nin, ili deziros sekvi nian ekzemplon kaj akompani nin kiel paŝtistoj.

—Vi prave parolis —diris don Quijote—. Kaj se la bakalaŭro Sansón Carrasco venos en nian arkadian grupon (kaj certe li venos), li povus nomiĝi paŝtisto Sansonino aŭ paŝtisto Carrascón; la barbiro Nicolás, Niculoso, laŭ la maniero de la antikva Boscán, kiu alinomis sin Nemoroso. Rilate al la pastro, mi ne scias, kian nomon doni al li, se ne ian derivaĵon de la vorto pastro: Pastroriambro, por ekzemplo. Pri la paŝtistinoj, kies amantoj ni estos, ni povos facile elekti iliajn nomojn, tiel facile kiel elpreni pirojn el korbo. Kaj tial, ke la nomo de mia sinjorino same konvenas al princino kiel al paŝtistino, mi ne bezonas ĝeni min, serĉante alian pli taŭgan al ŝi. Vi, Sancho, donos al via paŝtistino ajnan nomon, laŭ via elekto.

—Mi donos al ŝi nur la nomon Teresona, tre konforman al ŝia dikeco kaj al ŝia vera nomo, Teresa. Kaj, kiam mi prikantos ŝin en miaj versoj, oni vidos ke miaj deziroj estas ĉastaj, kaj

ke mi ne inklinas, male ol aliaj, serĉi alies panon en fremdaj hejmoj. Nu, la pastro ne devus havi paŝtistinon: alie, li donus mavan ekzemplon. Sed se la bakalaŭro volus havi unu, tio estus lia afero.

—Ho Dio, ni ĝuos vere belan vivon, amiko Sancho! —kriis don Quijote—. Kiel multe da klarnetoj, sakflutoj, tamburinoj kaj liutoj regalos nin per siaj sonoj! Kaj kio do, se inter tiel diversaj vibroj aŭdiĝus ankaŭ *albogues*? Tiam, mankus al ni preskaŭ neniu el la paŝtistaj instrumentoj.

—Kio estas *albogues*? —demandis Sancho—. Neniam en mia vivo mia aŭdis aŭ vidis ilin.

—*Albogues*, amiko Sancho —respondis don Quijote—, estas mincaj platoj el metalo, kies kunfrapiĝo faras sonon, ne tre agrablan aŭ harmonian, sed almenaŭ ne malplaĉan, kiu bone miksiĝas kun la rustikeco de sakflutoj kaj tamburinoj. La nomo *albogues* venas de la maŭra lingvo, same kiel aliaj vortoj komenciĝantaj per «al» en la kastilia: *almohaza*, *almorzar*, *alhambra*, *alguacil*, *alhucema*, *almacén*, *alcancía*... kaj ceteraj. Nia lingvo havas nur tri vortojn el la maŭra finiĝantajn per «i»: *borceguí*, *zaquizamí* kaj *maravedí*. *Alhelí* kaj *alfaquí* havas araban originon, kio duoble montriĝas per la komenca «al» kaj la fina «i». Ĉion ĉi mi preterpase mencias, ĉar ĝi venis en mian memoron, kiam mi hazarde parolis pri *albogues*. Unu cirkonstanco multe helpos nin pliperfektigi en nia ofico de paŝtistoj: mi havas, kiel vi scias, iomete da poezia talento, kaj la bakalaŭro Sansón Carrasco estas elstara poeto. Pri la pastro mi diras nenion, sed mi vetus, ke ankaŭ li havas la inklinton kaj la talenton versumi. Same mi pensas pri majstro Nicolás, ĉar ĝenerale la barbiroj ludas gitaron kaj komponas koplojn. Mi lamentos la foreston de mia belulino; vi kantos la konstanton de via amo; la paŝtisto Carrascón priploros la disdegnon de sia amatino, kaj

la pastro Pastroriambro tuŝos ajnan temon, laŭ sia plaĉo. Kaj tiel ĉio iros glate, kaj ni ne deziros ion plian.

—Sinjoro, mi estas tiel senfortuna —respondis Sancho—, ke mi timas, ke neniam alvenos la tempo, ne kiu ni ekzerciĝos per tia okupo. Ho kiom da bele poluritaj kuleroj mi faros, kiam estos paŝtisto! Kiom da *migas*!^[419] Kiom da kremo! Kiom da girlandoj! Kiom da paŝtistaj distroj! Per ĉio ĉi mi akiros famon, ne kiel saĝa, sed certe kiel sprita. Mia filino Sanchica alportos la manĝon al ni en la ŝafejon. Sed oni zorgu! Ŝi havas allogan korpon, kelkaj paŝtistoj estas pli malicaj ol simplaj, kaj mi ne volus, ke ŝi iru por lano kaj revenu pritondita: amaj deziroj kaj mavaj pasioj oftas tiel en la kampoj kiel en la urboj, tiel en la paŝtistaj kabanoj kiel en la reĝaj palacoj... Oni eliminu la tenton, kaj malaperos la peko; la koro ne avidas kion okulo ne vidas, kaj pli valoras eskapi trans la heĝon ol aŭskulti bonulan peton.

—Bonvolu, Sancho, ne pli da proverboj —diris don Quijote—. La unua el ili sufiĉus al vi por esprimi vian penson. Kaj mi jam ofte konsilis vin, esti ne tiel prodiga je proverboj kaj iom reteni vin ĉi-rilate. Sed ŝajnas al mi, ke mi predikas en dezerto: «La patrino donas al mi punon, sed mi plue ŝtelas la farunon».

—Via moŝto igas min memori la diron: «Kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota». Vi admonas min ne diri proverbojn, sed vi verŝas ilin duope.

—Rimarku, Sancho —respondis don Quijote—, ke mi uzas la proverbojn ĝuste kaj trafe, kaj ili konformas al la temo, kiel ringo al fingro; sed vi tiras ilin je la haroj, perforte trenas ilin, anstataŭ ilin enkonduki glate kaj facile. Kaj, se mi bone memoras, mi jam diris al vi alfoje, ke la proverboj estas kurtaj maksimumoj elprenitaj el la spertoj kaj meditoj de niaj antikvaj saĝuloj: kaj la proverbo uzata nek ĝuste nek trafe

pli similas al absurdo ol al maksimumo. Sed ni lasu ĉi aferon, kaj tial, ke jam venas la nokto, ni iom deviu de la vojo ĝis ia loko, kie ni povos tranokti. Pri la morgaŭa tago, Dio disponos.

Ili deturnis sin de la vojo kaj manĝis tarde kaj sobre, ĉe la ĉagreno de Sancho, kiu memoris pri la mizero kaj la rigora vivo de la vagantaj kavaliroj en arbaroj kaj montoj, kvankam kelkfoje ili trovis abundon en kasteloj kaj domoj, kiel, por ekzemplo, ĉe don Diego de Miranda, ĉe la edziĝo de la riĉa Camacho kaj ĉe don Antonio Moreno. Sed la ŝildisto pensis, ke nek la tago nek la nokto daŭras senfine, do li dormis la tutan tiun nokton, dum lia masto vigilis.

[419] Hispana vorto: «paneroj». Ankaŭ manĝaĵo el frititaj paneroj kun ajloj kaj lardo.

Ĉapitro 68

Pri la porka aventuro okazinta al don Quijote

La nokto aperis iom nigra, ĉar la luno, kvankam en la ĉielo, ne troviĝis en loko, kie oni povus ĝin vidi: eble sinjorino Diana ofte iras promeni al la antipodoj, kaj lasas ĉi tie la montojn obskuraj kaj la valojn tenebraj. Don Quijote cedis al la naturo, dormante sian unuan dormon, sed sen doni sin al la dua. Kontraŭe, Sancho neniam havis duan, ĉar li dormis seninterrompe de la nokto ĝis la mateno, kio montris lian sanan kompleksion kaj lian mankon de zorgoj.

La cerbumado de don Quijote tenis la hidalgon tiel sendorma, ke li vekis la ŝildiston kaj diris:

—Mi miras, Sancho, je la indiferentemo de via naturo. Mi preskaŭ kredas, ke oni vin faris el marmoro aŭ el dura bronzo, ĉar mankas al vi ĉia emocio aŭ sento. Vi dormas, kaj dume mi vigilas; vi kantas, kaj dume mi ploras; mi svenas de fasto, kaj dume vi torporas kaj eĉ ne povas spiri, ĉar vi ŝtopis al vi ĝiskreve la stomakon. Al bonaj servisto apartenas partopreni en la afliktoj kaj sentoj de iliaj sinjoroj. Rimarku: la sereno de ĉi nokto, kaj la soleco nin ĉirkaŭanta invitas nin intermeti vigilon en nian dormon. Stariĝu, je via vivo, iru iom for de ĉi tie kaj kun kuraĝa koro kaj dankema spirito, donu al vi tricent aŭ kvarcent vergojn, partopage de la vergoj, kiujn vi ŝuldas por la elsorĉo de Dulcinea. Kaj ĉi tion mi suplike petas de vi: mi ne volas lukti kun vi, kiel pasintfoje, ĉar mi scias, ke vi havas pezajn manojn. Kiam vi finos vian skurĝadon, ni pasos la ceteron de la nokto kantante: mi, pri la foresto de mia kara; vi, pri la firmo de via amo, kaj tiel ni komencos, jam de nun, ekzerciĝi por la paŝtista ofico, kiun ni plenumos en nia vilaĝo.

—Sinjoro —respondis Sancho—. Mi ne estas monaĥo, ke mi leviĝu meze de mia dormo kaj skurĝu min. Kaj ŝajnas al mi, ke ne estus facila afero pasi en unu momento de la doloro de la skurĝado al la plezuro de la kantoj. Via moŝto lasu min dormi kaj ne turmentu min per ĉi afero de la vergoj, se vi ne volas tedi min ĝis tia ekstremo, ke mi ĵuros, ke vi tuŝos al mi, ne unu haron de mia haŭto, sed eĉ ne unu fadenon de mia vesto.

—Ho, kala animo! Ho, kruela ŝildisto, sendanka al mia pano kaj al miaj favoroj iamaj kaj futuraj! Vi atingis pere de mi gubernatoran postenon, kaj pere de mi vi povos baldaŭ akiri la titolon de grafo aŭ alian similan nobelecon. Viaj esperoj plenumiĝos tuj kiam alvenos al sia fino ĉi jaro da ekzilo, ĉar mi *post tenebras spero lucem*.^[420]

—Mi ne komprenas tion —respondis Sancho—. Mi komprenas nur, ke, dum mi dormas, mi sentas nenian timon, esperon, zorgon aŭ ambicion. Dio benu la inventinton de la dormo, ĉar ĝi estas mantelo, kiu kovras la penson de la homo; manĝo, kiu kontentigas la malsaton; akvo, kiu estingas la soifon; fajro, kiu varmigas la fridon; frido, kiu moderigas la varmon, kaj fine, universala mono kapabla ĉion aĉeti, kaj pesilo kies teleroj tenas ĉe egala nivelo la paŝtiston kaj la reĝon, la ulon simplan kaj la saĝan. Laŭdire, la dormo havas nur unu mavan flankon, nome, ke ĝi similas al la morto. Kaj, inter mortinto kaj dormanto apenaŭ kuŝas diferenco.

—Neniam antaŭe mi aŭdis vin paroli tiel elegante kaj elokvente —diris don Quijote—. Kaj tio konfirmas la proverbon, kiun kelkfoje vi citas: «Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas».

—La diablo min prenu! —respondis Sancho—. Nuntempe, sinjoro, ne mi litanias per proverboj. Ankaŭ via moŝto lasas ilin eskapi el via buŝo duope kaj pli lerte ol mi. Inter viaj

proverboj kaj la miaj certe kuŝas la diferenco, ke la viaj venas ĝustatempe kaj la miaj neoportune. Tamen ili ĉiuj estas proverboj.

En ĉi momento de ilia konversacio aŭdiĝis surda kaj konfuza bruo etendiĝanta sur la ĉirkaŭaj valoj. Don Quijote stariĝis kaj almetis la manon al la glavo. Sancho kaŭris sub la azenon, barikadis sin unuflanke per la kunligitaj pecoj de la armaĵo kaj aliflanke per la ŝarĝo-selo, kaj tiel multe tremis de timo, kiel don Quijote de ekscito. La bruo intensiĝis laŭmezure kiel ĝi proksimiĝis al la du timantoj: pli ĝuste, al unu timanto, ĉar oni bone konas la kuraĝon de la alia.

Nu, okazis, ke kelkaj viroj peladis survoje, kaj en la noktaj horoj, pli ol sescent porkojn por vendi ilin en foiro. Kaj la grego faris tiom da bruo per siaj gruntoj kaj snufoj, ke don Quijote kaj Sancho surdiĝis kaj ne povis kompreni la kaŭzon de la tumulto. La multnombra kaj grunta porkaro aperis subite, impete kaj senorde kaj, senrigarde al la digno de don Quijote kaj Sancho, renversis kaj surtretis ilin, disĵetis la barikadojn de la ŝildisto kaj rulis, ne nur la hidalgon, sed ankaŭ lian ĉevalon. La subita atako de la sordidaj bestoj, kun ties grundoj kaj impeto, ĵetis en pelmelon la ŝarĝo-selon, la armojn, la azenon, la ĉevalon, la hidalgon kaj la ŝildiston. Sancho levis sin sur la piedoj, tiel bone kiel li povis, kaj petis de sia mastro ties glavon, dirante, ke li volas mortigi ses el tiuj moŝtaj kaj krud-manieraj porkoj. Ĉar li jam vidis, ke porkoj rulis ilin.

—Lasu tion, Sancho —respondis don Quijote—. Ĉi humiliga ofendo venis al mi kiel puno pro mia peko, kaj estas justa decido de la ĉielo, ke venkita kavaliro estu vorata de ŝakaloj, pikata de vespoj kaj tretata de porkoj.

—Kaj mi supozas —diris Sancho—, ke la ĉielo punas ankaŭ la ŝildiston de venkita kavaliro per mordoj de muŝoj, pikoj de

puloj kaj ronĝoj de la malsato. Se ni, ŝildistoj, estus filoj, aŭ proksimaj parencoj, de niaj kavaliroj, oni vidus logika tion, ke la puno de iliaj kulpoj falu ankaŭ sur nin ĝis la kvara generacio. Sed, kion komuna havas la Sanchos kun la Quijotes? Nu, denove ni faru al ni oportune, kaj ni dormu dum la iometo da nokto restanta. Morgaŭ frue venos plue, kaj la bona sorto nin akompanu.

—Vi dormu, Sancho —respondis don Quijote—, ĉar por dormi vi venis en la mondon. Mi naskiĝis por vigili, kaj de nun ĝis la mateniĝo mi donos liberon al miaj pensoj, kaj ilin elverŝos en la formo de madrigalo, kiun mi komponis en mia kapo hieraŭ nokte, sen ke vi scius.

—Ŝajnas al mi —diris Sancho—, ke la pensoj taŭgaj por versioj ne tro multas. Via moŝto madrigalu laŭplaĉe, dum mi dormos laŭpove.

Kaj tuj poste, prenante al si tiom da grundo, kiom li volis, la ŝildisto sin buligis kaj dormiĝis ĝisronke, sen ke lin perturbus kaŭcioj, ŝuldoj aŭ afliktoj. Don Quijote, apogite kontraŭ la trunko de fago aŭ kork-arbo (ĉar Cide Hamete ne precizigas la specon de arbo) kaj kun la sola akompano de siaj suspiroj, kantis la jenon:

Pensante, ho Amoro,
ke vi min vundas forte kaj terure,
mi volas morti nure,
ke min ne plu turmentu la doloro.

Sed kiam min jam tentas
la penso gliti al la lasta spiro,
mi tian ĝojon sentas,
ke min denove prenas viv-deziro.

Viv' estas, por mi, morto;

kaj re al vivo, morto min altiras.
Ho, kia stranga sorto:
kaj viv' kaj morto kontraŭ min konspiras.

Kun ĉi verso don Quijote suspiris kaj verŝis nombron da larmoj, kvazaŭ lian koron ŝirus duobla doloro: pro lia venkiteco kaj pro la foresto de Dulcinea.

Ĉe tio alvenis la tagiĝo, la suno trafis per siaj radioj la okulojn de Sancho, kiu vekigis, streĉante kaj skuante la duoninertajn membrojn. Poste li vidis la katastrofon kaŭzitan de la porkoj en la viktualio, kaj malbenis la gregon pli ol unu fojo. Fine, ili daŭrigis sian vojaĝon, kaj, ĉe la falo de la nokto, vidis alproksimiĝi proksimume dek surĉevalajn virojn kaj kvar aŭ kvin piedirajn. La koro de don Quijote skuiĝis de ekscito, dum la ŝildisto tremis, ĉar la alrajdantoj portis lancojn kaj ŝildojn kaj avancis batal-prete.

Don Quijote sin turnis al Sancho kaj diris:

—Sancho, se mi povus helpi min per miaj armiloj, kaj se mia promeso ne katenus al mi la manojn, mi forblovus ĉi skadron kiel aer-vezikon. Sed eble tio estas, ne skadro, sed io alia.

Tiam alvenis la rajdantoj, kaj, sen diri eĉ unu vorton, levis la lancojn, ĉirkaŭis la hidalgon, almetis la pinton de la lancoj al liaj brusto kaj dorso kaj minacis lin per morto. Unu el la piediraj viroj, kun fingro sur la lipoj por trudi silenton, prenis la bridon de Rocinante kaj deturnis la ĉevalon de la vojo, dum la ceteraj surpiedaj uloj pelis la azenon rajdatan de Sancho kaj sekvis la paŝojn de la alia, meze de mirinda silento. Don Quijote volis du tri fojojn demandi, kien oni lin kondukas, kaj kion ili volas: sed, tuj kiam ili komencis aperti la buŝon, lia eskorto rapidis ĝin fermi per la lancopintoj. Kaj same okazis al Sancho, ĉar apenaŭ li montris ian deziron

paroli, unu el la piediraj alpremis sian lancon al li, kaj same al la azeno, kvazaŭ oni pensus, ke ankaŭ ĝi volas paroli.

Densiĝis la nigro de la nokto, oni akcelis la rapidon de la iro, kaj kreskis la timo de la du kaptitoj, des pli, ke de tempo al tempo ili aŭdis diri:

—Marŝu, trogloditoj!

—Silentu, barbaroj!

—Pagu vian kulpon, antropofagoj!

—Ne plendu, scitoj!

—Ne apertu la okulojn, Polifemoj, murdistoj, hom-manĝaj leonoj!

Per ĉi nomoj, kaj aliaj similaj, la eskorto turmentis la orelojn de la kompatindaj don Quijote kaj Sancho.

Dume, Sancho diris en si:

—Ĉu ni trogladitaj? Ĉu ni barbiroj? Ĉu ni sarkofagoj? Ĉu ni hundetoj, kiajn oni alvokas, dirante: ŝit, ŝit! Al mi tute ne plaĉas tiaj monoj. Mava vento alblovas al ni. La misfortunoj trafas nin multope, kiel batoj hundon. Kaj Dio volu, ke ĉi terura aventuro finiĝu per nura skurĝado.

Don Quijote, plena de stuporo, ne sukcesis, malgraŭ siaj klopodoj, diveni la sencon kaj la celon de la insultoj, kvankam li komprenis, ke li devus esperi el ili nenion bonan, kaj timi ĉion mavan. Proksimume unu horon post la noktiĝo, ili alvenis al kastelo, kies aspekton don Quijote baldaŭ rekonis, ĉar temis pri la kastelo de la duko, kie antaŭ ne longe la hidalgo gastis.

—Dio min protektu! —li diris, tuj kiam li rekonis la lokon—. Kion signifas ĉio ĉi? Vere, en ĉi domo regis ĝentilo kaj afablo. Sed por la venkitoj, la bono iĝas mavo, kaj la mavo pleja malbono.

Ili eniris en la ĉefan korton de la kastelo kaj vidis ĝin tiel aranĝita kaj garnita, ke ilia konsterno kreskis, kaj ilia timo duobliĝis, kie oni vidos en la sekvanta ĉapitro.

[[420](#)] Latine: «mi esperas la lumon post la tenebro». Frazo el la Biblio (Ijob 17,12).

Ĉapitro 69

Pri la plej rara kaj stranga aventuro okazinta al don Quijote en la tuto de ĉi granda historio

La rajdantoj deĉevaliĝis, kune kun la piediraj viroj prenis abrupte kaj violente la hidalgon kaj la ŝildiston, kaj en siaj brakoj portis ilin al la korto. Ĉirkaŭ ĝi ardis preskaŭ cent torĉoj fiksitaj al surmuraj ingoj, kaj laŭlonge de la galerioj de la palaco lumis pli ol kvincent lampoj, tiel, ke malgraŭ la nigro de la nokto, estis klare kiel en la tago. Meze de la korto, proksimume ses futojn super la tero, leviĝis katafalko tute kovrita per enorma baldakeno el nigra veluro, kaj ĉirkaŭe, sur la ŝtupoj, brulis pli ol mil kandeloj el blanka vakso en pli ol mil arĝentaj kandelingo. Kaj sur la katafalko kuŝis la kadavro de pucelo tiel rava, ke ŝia belo ŝajnis beligi la morton mem. Ŝia kapo, kronita per girlando el diversaj bonodoraj floroj, ripozis sur brokata kuseno, kaj ŝi tenis inter siaj manoj, krucitaj sur la brusto, flavan palmobranĉon, t.e. la emblemon de la venko. Ĉe unu flanko de la korto oni starigis pli frue scenejon, kie, sur du seĝoj, sidis du personoj, ŝajne reĝoj, veraj aŭ fiktivaj, ĉar ili portis kronon sur la kapo kaj sceptron en la manoj. Ĉe la flanko de ĉi scenejo, kien oni ascendis per kelkaj ŝtupoj, staris aliaj du seĝoj, kaj la kaptintoj de don Quijote kaj Sancho sidigis ilin ambaŭ sur ĉi paron da seĝoj, meze de absoluta silento kaj komprenigante per signoj al la hidalgo kaj al la ŝildisto, ke ankaŭ ili tenu la buŝon fermita. Sed eĉ sen proĥibaj gestoj ili same silentus, ĉar ilia surprizego antaŭ ĉi spektaklo paralizis ilian langon.

Tiam surpriris la scenejon du gravuloj kun multenombra eskorto, kaj don Quijote vidis, ke la paron formas la duko kaj la dukino, t.e. liaj iamaj gegastigantoj. Ambaŭ sidiĝis sur du

riĉe ornamitaj seĝoj, apud la du personoj, kiuj ŝajnis reĝoj. Neeble ne senti miron kaj konsternon ĉe tio, des pli, kiam don Quijote rimarkis, ke la morta korpo sur la katafalko estas la kadavro de la bela Altisidora! Kiam la duko kaj la dukino surpriris la scenejon, don Quijote kaj Sancho stariĝis kaj faris al ili profundan riverencon, kaj la gedukoj reciprokis, klinante iom la kapon. Subite unu viro proksimiĝis al Sancho, ĵetis sur lin robon el nigra fusteno tute pripentrita per fajraj flamoj, detiris lian ĉapon, anstataŭigis ĝin per kartona mitro, simila al la kapvestoj portataj de la kondamnitaj de la Sankta Inkvizicio, kaj flustris en lian orelon ne aperti la buŝon, ĉar, alie, oni ŝtopus ĝin per bendo, aŭ oni prenos de li la vivon. Sancho rigardis sin de la kapo ĝis la piedoj, kaj vidis, ke li ardas inter flamoj. Sed tial, ke li sentis neniam brul-vundon, li tute ne zorgis. Li demetis la mitron, vidis ĝin kun ties pentritaj diabloj, denove ĝin metis sur sian kapon, kaj diris en si:

—Bone, ke nek la flamoj bruligas, nek la diabloj min forportas.

Ankaŭ don Quijote rigardis lin, kaj, kvankam la timo paralizis siajn sentojn, li ne povis ne ridi je la aspekto de Sancho. Tiam, ŝajne de sub la katafalko, komencis leviĝi agrabla kaj dolĉa muziko de flutoj, kies melodio, sen akompano de homaj voĉoj —ĉar en tia loko eĉ la silento mem mutis— sonis mole kaj nostalgie. Subite, apud la kapkuseno de la ŝajne morta korpo aperis bela junulo vestita laŭ la Romana stilo, kaj, akompanante sin per harpo, kantis kun voĉo klara kaj bele nuancita la du jenajn stancojn:

Ĝis viv' revenos al Altisidora
mortinta pro kruel' de don Quijote,
kaj dum en ĉi kortego brile ora
funebros damoj, mornaj ĝisĵabote,
kaj la duenjojn en drelik' rigora

aflikto premos daŭre kaj despote,
mil kantos ŝin, ho fato, ho gracio!
pli bone ol la bardo de Tracio.^[421]

Kaj pensas mi, ke, eĉ en la transmondo,^[422]
ne ĉesos mi en ĉi laboro kanta:
de mia lango morta fluos ondo
por laŭdi vin, pucelo plej amanta.
L' animo mia, for de l' vivo-rondo
kaj kondukata tra la Stikso hanta,
tiel inspire kantos vin sen ĉeso,
ke haltos aŭdi l' akvo de Forgeso.

—Sufiĉe jam! —diris unu el la du ŝajnaj reĝoj—. Sufiĉe jam,
dia kantanto. Neniam vi finus la taskon prezenti al ni la
morton kaj la ĉarmojn de la senkompara Altisidora. Ŝi ne
mortis, male ol la senscia mondo pensas: ŝi vivas ankoraŭ
sur la lango de la Famo, kaj denove efektive vivos, kiam
Sancho Panza, ĉi tie troviĝanta, suferu la punon, kiu ŝin
relevos al la lumo. Ho vi, Radamantiso, vi juĝas kun mi en la
tenebraj kavernoj de Leteo, kaj scias kion decidis la
nepenetrebla destino rilate al la resurekto de ĉi pucelo: nu,
tuj parolu kaj faru la deklaron, por ke ne prokrastiĝu la
feliĉo, kiun ni atendas de ŝia revivigo.

Apenaŭ tion diris Minoo, juĝisto kaj kompano de
Radamantiso, ĉi lasta stariĝis kaj diris:

—Nu, homoj de ĉi palaco, senrangaj kaj nobelaj, altaj kaj
basaj, venu unu post alia, kaj ĉiu faru dudek kvar naztordojn
al la vizaĝo de Sancho, kaj dek du pinĉojn kaj ses
pinglopikojn al liaj brakoj kaj renoj, ĉar la resurekto de
Altisidora dependas de la plenumo de ĉi ceremonio.

Tiam Sancho rompis sian silenton, kriante:

—Je mia vivo, mi preferus turniĝi en maŭron, antaŭ ol konsenti, ke oni tordu al mi la nazon. Per mil diabloj, kion komunan havas la knedado de mia vizaĝo kun la resurekto de ĉi pucelo? «Tiom bongustis al la olda la spinacoj, ke ŝi manĝis ilin verdaj, sekaj... kaj sen laco». Oni ensorĉis Dulcinean, kaj mi devas skurĝi min, por ke ŝi elsorĉiĝu. Altisidora mortis de ia malsano, kiun Dio volis sendi al ŝi, kaj, por ke ŝi resurektu, oni devas naztordi min dudek kvar fojojn, trui mian korpon per pinglopikoj kaj bluigi al mi la brakojn per pinĉoj... Faru tian ŝercon al via avo! Mi estas olda hundo kaj ne obeas ajnan fajfon!

—Tiam, vi mortos —laŭte respondis Radamantiso—. Moligu vin, tigro; humiligu vin, orgojla Nimrodo; suferu silente, ĉar nenion neeblan oni petas de vi, kaj ne cerbumu pri la rigoroj de ĉi afero. Oni naztordos vin; oni truos vin; oni pinĉos vin, ĝis vi veos. Nu, homoj, plenumu mian ordonon; se ne, mi ĵuras kiel honesta viro, ke vi priploros, ke vi naskiĝis.

Ĉe tio aperis proksimume ses duenjoj, unu post la alia, trairantaj la korton. Kvar el ili portis okulvitrojn, kaj ĉiuj tenis levita la dekstran manon; la manikoj, suprenfalditaj, rivelis kvar colojn da nuda brako, por ke la manoj ŝajnu pli longaj, laŭ la nuna modo. Tuj kiam Sancho vidis la duenjojn, li diris, muĝante kiel taŭro:

—La tuta mondo fingrumu min, sed neniam la duenjoj, tute ne! Oni katumu al mi la vizaĝon, kiel oni faris al mia mastro en ĉi sama kastelo. Oni truu mian korpon per la pintoj de akraj dagoj. Oni rostu miajn brakojn per ruĝ-ardaj tenajloj. Mi ĉion eltenos kun pacienco por komplezi ĉi sinjorojn. Sed duenjojn ne tuŝu min: tion mi ne toleros, eĉ se la diablo min prenos.

Ankaŭ don Quijote rompis sian silenton, dirante al Sancho:

—Havu paciencon, filo, faru komplezon al ĉi sinjoroj, kaj danku la ĉielon, ke ĝi dotis vin per tia kapablo, ke, vin punante, vi povas elsorĉi ensorĉitojn kaj revivigi mortintojn.

Jam la duenjoj proksimiĝis al Sancho, kaj, pli trankvila kaj konsentema, li faris al si oportune sur la seĝo kaj prezentis sian vizaĝon kaj barbon al la unua duenjo. Ŝi faris al li belan naztordon kaj poste profundan riverencon.

—Ne uzu tiom da ĝentilaĵoj kaj ankaŭ ne tiom da ŝminko, sinjorino duenjo —diris Sancho—. Je Dio, viaj manoj fetoras je tualeta vinagro!

Fine ĉiuj duenjoj naztordis lin, kaj multaj aliaj domanoj lin pinĉis. Sed li ne povis elteni la pikadon de la pingloj, do li saltis de la seĝo kun videbla kolero, prenis de apud si unu brulan torĉon, kaj ĵetis sin kontraŭ la duenjoj kaj la ceteraj ekzekutistoj, kriante:

—For, senditoj de la infero, for! Ĉu vi kredas ke mi estas el bronzo kaj ne sentas vian turmentadon?

Ĉe tio Altisidora, sendube laca post longa kaj senmova kuŝado, turnis sin surflanken, kaj la spektantoj diris unuvoĉe:

—Altisidora vivas! Altisidora vivas!

Radamantiso petis la ŝildiston, ke li trankviliĝu, ĉar ilia celo estas jam atingita. Don Quijote, vidante Altisidora moviĝi, genuiĝis antaŭ Sancho kaj diris:

—Nun estas la ĝusta momento —ho filo de mia koro, ne jam ŝildisto mia— por ke vi donu al vi laŭdeve kelkajn el la vipobatoj necesaj por la elsorĉo de Dulcinea. Mi diras la ĝustan momenton, ĉar via kapablo videble posedas nun sian tutan forton kaj povas atingi kion oni esperas de ĝi.

—Ĉi afero ŝajnas al mi, ne mielo sur kukon, sed galo sur galon. Estus bele ke, post la naztordoj, pikoj kaj pinĉoj, venus la vipado. Nun mankas ankoraŭ, ke vi ligu al mia kolo pezan ŝtonon kaj ĵetu min en puton, kio ne donus al mi grandan zorgon, se, por kuraci la malsanojn de aliaj personoj, mi devus esti la viktimo. Lasu min en paco: se ne, mi ĵuras, ke mi ne respondos pri mi mem, kaj sendos ĉion al la diablo.

Altisidora levis sin en sidan pozicion sur la katafalko, kaj oni kriis unuvoĉe:

—Vivu Altisidora! Altisidora vivu longe!

La gedukoj kaj la reĝoj Minoo kaj Radamantiso stariĝis kaj en grupo kun don Quijote kaj Sancho iris al Altisidora kaj helpis ŝin descendi de la katafalko. La knabino, simulante duonsveni, sin klinis antaŭ la gedukoj kaj la reĝoj, flankrigardis la hidalgon kaj diris:

—Dio vin pardonu, indiferenta kavaliro, ĉar, pro via kruelo, mi sidis en la transa mondo ŝajne pli ol mil jarojn. Kaj vin, ho kompatema ŝildisto de la mondo, mi dankas pro mia nova vivo. Amiko Sancho, de nun vi povos disponi pri ses ĉemizoj miaj, kiujn mi donos al vi, por ke vi faru el ili ses por vi. Kaj, kvankam ne ĉiuj estas novaj, almenaŭ ili estas puraj.

Sancho, kun la genuoj sur la planko kaj la mitro en la mano, dankis ŝin pro la donaco per kiso sur ŝia mano. La duko ordonis, ke oni prenu de li la mitron kaj la robon el flamoj, kaj redonu al li lian ĉapon kaj sajon. Sancho suplikis, ke oni lin permesu konservi la robon kaj la mitron kiel memoraĵon de tiel neimagebla aventuro. La dukino konsentis, dirante, ke li scias tre bone, ke ŝi estas lia granda amikino. La duko ordonis, ke oni retiru sin de la korto, ke ĉiu iru en la internon

de la kastelo, kaj ke oni konduku la hidalgon kaj la ŝildiston al la samaj ĉambroj, kie ili jam antaŭe loĝis.

[[421](#)] Orfeo, sorĉa muzikisto, filo de Apolono kaj Klinoa. Subiris en Hadeson por de tie revenigi sian edzinon Eŭridican.

[[422](#)] La versoj de ĉi tiu oktavo apartenas al la 3-a *Eklogo* de Garcilaso de la Vega.

Ĉapitro 70

Kiu sekvas la sesdeknaŭan kaj traktas pri aferoj tute necesaj por la klara kompreno de ĉi historio

Sancho tradormis la nokton sur rul-lito en la sama ĉambro kun don Quijote, kion la ŝildisto volote estus evitinta, ĉar li sciis, ke lia mastro ne lasus lin dormi per siaj demandoj kaj respondoj; kaj Sancho ne inklinis tre babili, tial, ke la doloroj de lia pasinta torturo tro freŝis en lia memoro kaj ne lasis lian langon libera. Verdire, li preferus dormi sola en kabano, ol akompanata en tiel luksa ĉambro. Liaj timo kaj suspekto montriĝis bone bazitaj, ĉar, apenaŭ don Quijote enlitiĝis, li diris:

—Kion vi pensas, Sancho, pri la ĉi-nokta evento? Grandan kaj potencan forton havas la disdegnata amo. Vi vidis per viaj propraj okuloj Altisidoran morta. Kaj ŝin pereigis, ne sagoj, ne glavoj aŭ aliaj armoj, ne letala veneno, sed la kruelo kaj la rigoro, per kiuj mi ĉiam traktis ŝin.

—Kiom pli bone, se ŝi mortintus, kiel kaj kiam plaĉus al ŝi — respondis Sancho—, kaj lasus min trankvila, se konsideri, ke mi nek enamigis ŝin al mi, nek disdegnis ŝin en mia tuta vivo. Mi ne scias, nek kapablas kompreni, kiel mi jam diris al vi alifoje, kiamaniere la resurekto de Altisidora, pucelo pli kapricema ol saĝa, povas havi ian rilaton kun la torturado de Sancho Panza. Nun mi klare vidas, ke en la mondo ekzistas sorĉoj kaj sorĉistoj, kaj Dio gardu min de ili, ĉar mi ne scias gardi min mem. Ĉiuokaze, mi suplikas vian moŝton, ke vi lasu min dormi kaj ne faru al mi pli da demandoj, se vi ne volas, ke mi ĵetu min tra la fenestro.

—Dormu, amiko Sancho —respondis don Quijote—, se vin permesas dormi la doloro de naz-tordoj, pikoj kaj pinĉoj.

—Nenia doloro superis la humiligan ofendon de la naz-tordoj, eĉ se nur pro tio, ke ilin faris al mi manoj de duenjoj. La diablo ilin prenu! —diris Sancho—. Sed mi refoje suplikas vian moŝton, ke vi lasu min dormi. La dormo estas rimedo kontraŭ la mizeroj spertataj en nia vekiteco.

—Bone do —diris don Quijote—. Dio vin akompanu.

Ambaŭ ekdormis, kaj Cide Hamete, aŭtoro de ĉi longa historio, profitas ilian dormon por rakonti al ni, kio do movis la dukon kaj la dukinon kovi kaj efektiviĝi la ĵus priskribitan mistifikon. Li diras, ke la bakalaŭro Sansón Carrasco ne forgesis, ke don Quijote faligis kaj venkis la Kavaliron de la Speguloj, kies falo kaj fiasko renversis kaj ruinigis lian projekton; tiel do, li decidis provi denove sian sorton kun la espero sukcesi ĉi-foje. Pere de la paĝio alportinta al Teresa Panza, edzino de Sancho, la leteron kaj la donacojn, la bakalaŭro informis sin pri la tiama restadejo de don Quijote, havigis al si novajn armaĵojn kaj ĉevalon, pentris blankan lunon sur sian ŝildon, kaj ŝarĝis ĉion sur mulon, kiun kondukis, ne lia iama ŝildisto Tomás Cecial —ĉar la bakalaŭro timis, ke don Quijote aŭ Sancho povus rekoni lin— sed alia kampulo. Poste Sansón iris al la kastelo de la duko, kaj la nobelo informis lin pri la foriro de la hidalgo kaj pri ties intenco direkti sin al Zaragoza partopreni tie en la turniroj. La duko rakontis al la bakalaŭro ankaŭ pri la mistifiko farita al don Quijote rilate al la elsorĉo de Dulcinea je la kosto de la pugo de Sancho. Kaj fine li parolis pri la ŝerco de Sancho kontraŭ lia propra mastro, ĉar la ŝildisto igis lin kredi, ke Dulcinea estas ensorĉita kaj transformita en kampulinon, kaj pri tio, ke la dukino, lia edzino, konvinkis Sanchon, ke li eraras, kaj ke vere kaj fakte oni ensorĉis Dulcinean. La bakalaŭro miris kaj ridis tiel je la ruzo kaj simpla de Sancho

kiel je la ekstrema frenezo de don Quijote. La duko petis lin, ke, post ol li renkontus denove la hidalgon, li, venkite aŭ venkinte, revizitu lin en sia revena vojaĝo por rakonti al li ĉion okazintan. La bakalaŭro promesis tion fari, forrajdis serĉi la hidalgon, ne trovis lin en Zaragoza, plu iris sur la vojo antaŭen... kaj la rezulton oni jam konas. Poste li revenis al la kastelo de la duko kaj rakontis al li ĉion, inkluzive la kondiĉojn de la duelo, kaj diris, ke don Quijote, kiel bone vaganta kavaliro, jam iras sur la vojo returne por plenumi sian vorton sidi en sia vilaĝo unu jaron, en kies tempo eble li resaniĝus de sia frenezo. Sansón aldonis, ke, fakte por atingi tion, li surmetis diversajn maskovestojn, kaj ke estus bedaŭrinde, ke viro tiel inteligenta kiel don Quijote restus freneza. Poste Sansón adiaŭis la dukon, revenis al sia vilaĝo kaj atendis tie la hidalgon, kiu sekvadis, se tiel diri, liajn paŝojn.

La duko havis tiam la ideon fari al don Quijote la menciitan ŝercon: tiel multe plaĉis al li la humoro de Sancho kaj de don Quijote! Sur la vojoj foraj kaj proksimaj ĉirkaŭ la kastelo, en lokoj kie —li pensis— povus pasi la hidalgo revene al sia vilaĝo, la duko postenigis nombron da servistoj surpiedaj kaj surĉevalaj, kun la ordono, ke ili konduku lin al la kastelo, kontraŭ lia volo se necese, se oni lin trovas. Nu, oni lin trovis, avizis la dukon, kaj ĉi lasta, tiel avertita, kaj jam antaŭe ĉion preparinta, ordonis fajri la torĉojn kaj la lampionojn de la korto kaj meti Altisidoran sur la katafalkon, kun la tuto da rekvizitoj jam menciitaj; kaj ĉio aspektis tiel nature kaj konvinke, ke ĝi apenaŭ diferencis de la vero.

Cide Hamete eĉ asertas, ke, laŭ lia opinio, la mistifikantoj frenezis tiel multe kiel la mistifikatoj, kaj ke la gedukoj estis ĉe la rando aperi kiel idiotoj, ĉar ili tiel forte klopodis ŝerci kontraŭ du stultuloj.

Kiam la manteniĝo ilin surprizis, unu dormis ankoraŭ ĝisronke; kaj la alia vigilis sub la influo de siaj ekzaltaj pensoj, ĉar don Quijote, venkito aŭ venkinto, neniam ŝatis pigri en la molo de la plumo-lito. Nu, sekvante la humoron de siaj gemastroj, Altisidora (reveninta, laŭ la hidalgo, de la morto en la vivon), en tuniko el blanka tafeto prisemita per or-koloraj floroj, kun la sama girlando, kiun ŝi portis sur la katafalko, kun la hararo loza sur la ŝultroj, kaj apogate al longa bastono el bela kaj nigra ebono, eniris en la ĉambron de don Quijote. Ĉi apero kaŭzis al li tiom da konfuzo kaj konsterno, ke li buliĝis kaj kaŝis sin preskaŭ tute sub tukoj kaj peplomoj, nekapabla diri eĉ unu vorton de saluto. Altisidora sidiĝis sur seĝo apud la kapo de la lito, ĵetis fortan suspiron kaj diris kun voĉo mola kaj karesa:

—Kiam virinoj de alta rango kaj ĉastaj puceloj surtretas sian propran honoron, permesante, ke iliaj langoj diskonigu tute senrezerve la sekreton de iliaj koroj, tiam ili troviĝas en delikata situacio. Sinjoro don Quijote de La Mancha, mi estas unu el ĉi virinoj am-frapitaj, venkitaj kaj senesperaj, sed tiel multe tro pacienca kaj honesta, ke mia animo eksplodis pro la longa retenado de mia pasio, kaj mi perdis la vivon. Pro aflikto kaŭzita de via kruelo, ho vi, obstina kavaliro, pli dura ol marmor' al miaj plendoj, mi kuŝis morta du tagojn, aŭ almenaŭ tion oni poste diris al mi. Kaj mi ne restis definitive en la transa mondo, dank' al tio, ke Amoro min kompatis kaj donis rimedon al mia malsano per la turmento de ĉi bona ŝildisto.

—Amoro povintus helpi sin per mia azeno —diris Sancho—, kaj mi tre dankus lin pro tio—. Sed diru, sinjorino (kaj la ĉielo favoru vin per amanto pli tenera ol mia mastro!) kion vi vidis en la transa mondo? Kia estas la infero? Ĉar mortintoj en stato de despero nepre devas iri tien!

—Se diri la veron —respondis Altisidora—, ŝajne mi ne tute mortis, ĉar en la inferon mi ne eniris: la enirintoj tien ne povas eliri, eĉ se ili volus. Verdire, mi alvenis ĝis la pordo, kie proksimume dek du diabloj en kuloto kaj saĵo, kun Valonaj kolumoj garnitaj per flandra punto, kun manumoj el la sama materialo, kaj kun kvar koloroj da nuda brako por ke la manoj ŝajnu pli longaj, ludis tenison. Ili uzis fajrajn rakedojn kaj (jen plej miriga afero) ludis, ne per pilkoj, sed per libroj ŝajne plenaj de aero kaj stupo. Tamen, min absolute surprizis la fakto, ke ĉiuj ludantoj grumblis, kverelis kaj sakris, kvankam, kiel sciante, en la ludoj gajnantoj ĝojas kaj la perdantoj tristigas.

—Ne strange —diris Sancho—. La diabloj, ludantaj aŭ ne, neniam povas senti ĝojon, eĉ se ili gajnus.

—Jes, sendube —respondis Altisidora—. Sed alia afero tre mirigas, pli ĝuste, mirigis min, nome, ke per la unua raked-frapo la pilko detruigis kaj ne plu taŭgis, sekve la diabloj konsumis librojn oldajn kaj novajn kun eksterordinara rapido. Kaj tiel fortan baton ili donis al unu libro, nova kaj forte bindita, ke ties intesto, mi volas diri, ties folioj, disflugis. Diris unu diablo al la alia: «Rigardu, pri kio temas la libro». Kaj lia kompano respondis: «Ĝi estas la *Dua Parto de la Historio de don Quijote de La Mancha*, verkita, ne de ĝia originala aŭtoro Cide Hamete, sed de aragono naskiĝinta, laŭ li, en Tordesillas». «Formetu ĝin!», kriis la unua diablo. «Ĵetu ĝin en la abismon de la infero, ke mi ne plu ĝin vidu!». «Tiel mava ĝi estas?», demandis la alia. «Tiel mava, ke se mi entreprenus fari ĝin pli malbona, mi ne sukcesus». Ili daŭrigis sian ludon, pafante aliajn librojn per la rakedoj. Sed, kiam mi aŭdis la nomon de mia kara amata don Quijote, mi penis reteni ĉi vizion en mia memoro.

—Sendube temis pri vizio —diris don Quijote—, ĉar en la mondo ekzistas sole nur unu don Quijote: mi mem. Esta

vere, ke tiu dua parto de la historio cirkulas de homoj al homoj, sed haltas en nenies manoj, ĉar ĉiu ĝin reĵetas kvazaŭ pilkon. Mi sentis do nenian angoron, kiam mi aŭdis, ke mi vagas kiel fantomo en la tenebroj de la infera abismo, aŭ en la klara lumo de la tero, ĉar mi ne estas la protagonisto de tia historio. Se ĝi estos bona, fidela al la vero, ĝi vivos dum jarcentoj; se mava, ne tro longos ĝia vojo de la lulilo al la tombo.

Altisidora pretis daŭrigi sian aman plendadon kontraŭ la hidalgo, sed antaŭ ol ŝi povus paroli, li diris:

—Mi jam sciigis al vi multfoje, sinjorino, ke min afliktas, ke vi elektis min kiel objekton de viaj pensoj, ĉar mi povas nur danki vin pro ili, sed ne ilin reciproki. Mi venis en la mondon por aparteni al Dulcinea de El Toboso. La destino (se ĝi ekzistas) rezervis min por ŝi, kaj pensi, ke alia ĉarmulino povus anstataŭi ŝin en mia koro, estus pensi ion neimageblan. Tio devus sufiĉi, por ke vi seniluziiĝu kaj teniĝu inter la limoj de via pudoro: ĉar vanas pretendi neeblon.

Ĉe tio Altisidora, simulante grandan agitiĝon kaj furiozon diris:

—Je Dio, don Gado, bronza-kora, ŝton-anima, pli obstina kaj senkonsidera ol kampulo, kiam li havas la ĉefan voĉon! Se mi ĵetos min kontraŭ vin, mi elŝiros al vi la okulojn! Ĉu vere vi pensas, don venkito kaj don trabatito, ke mi mortis pro vi? Sciu, ke la ĉi-nokta spektaklo estis nur farso. Mi ne estas virino preta toleri, pro kamelo kiel vi, eĉ doloreton en la nigro de miaj ungoj, des malpli lasi min morti.

—Tion mi firme kredas —diris Sancho—, ĉar morti pro amo estas ne pli ol ridinda fantazio. La geamantoj parolas pri tia morto, sed, kiu kredus, ke ĝi efektive okazas?

En ĉi momento de ilia konversacio, eniris en la ĉambron la muzikanto-poeto, kiu kantis la du stancojn en la jam priskribita ceremonio. Li faris grandan riverencon al don Quijote kaj diris:

—Via moŝto, sinjoro kavaliro, kalkulu min inter viaj plej fidelaj servantoj, ĉar mi jam de longe admiras vin kaŭze de via famo kaj de viaj faroj.

—Sinjoro —respondis don Quijote—. Bonvolu diri al mi, kiu vi estas, ke mi povu danki vin, kiel vi meritas.

La junulo respondis, ke li estas la muzikanto kaj panegiristo de la lasta nokto.

—Nu, via moŝto havas tre belan voĉon —diris don Quijote—, kvankam via kanzono ŝajnas al mi iom ekstertema. Kion komunan havas la stancoj laŭ la stilo de Garcilaso kun la morto de ĉi pucelo?

—Ne tro miru je tio, sinjoro —respondis la muzikanto—. La novicaj poetoj de nia epoko kutimas verki laŭpove kaj plagiati laŭvole, senrigarde al la postuloj de la intrigo kaj de la temo, kaj donas poezian formon eĉ el la plej granda stultaĵo, kiun ili verkas aŭ kantas.

Don Quijote pretis respondi, sed tiam la duko kaj la dukino eniris lin viziti kaj havis kun li longan kaj agrablan konversacion. Sancho intervenis en la babilado kun tiom da sprito kaj drola humoro, ke la gedukoj denove miris je lia mikso de simpla kaj sagaco. La hidalgo petis ilian permeson por foriri en tiu sama tago, dirante, ke, al venkita kavaliro kiel li, pli apartenas loĝi, ne en reĝa palaco, sed en porkejo. Ili volonte donis sian permeson, kaj la dukino demandis al la hidalgo, ĉu Altisidora gajnis al si lian bonvolon.

—Sciu, sinjorino —li respondis—, ke ĉio riproĉinda en tiu pucelo originas en ŝia pigro. Por tion korekti, ŝi devus havi konstantan kaj honestan okupon. Ŝi diris al mi ĉi tie, ke oni uzas punkton en la infero, kaj tial, ke certe ŝi scias ĝin fari, ŝi ne ĉesu movi la kudrilojn, por ke en ŝia imago ne moviĝu la bildoj de ŝia deziro: tion mi kredas, opinias kaj konsilas.

—Ankaŭ mi —aldonis Sancho—, ĉar neniam mi vidis en mia vivo kudristinon, kiu mortus pro amo. La puceloj laborantaj pli zorgas fini sian taskon ol pensi pri am-aferoj. Mi parolas el propra sperto, ĉar, kiam mi pioĉas, mi ne memoras pri mia duono, mi volas diri, pri Teresa Panza, kiun mi amas pli ol la pupilojn de miaj okuloj.

—Bone dirite, Sancho —intervenis la dukino—. Mi zorgos, ke de nun mia Altisidora tenu sin okupata per kudro-laboroj, ĉar ŝi tre kompetentas ĉi-rilate.

—Ne necesas, sinjorino, uzi tian rimedon —diris Altisidora—, ĉar la penso, ke ĉi fripona vagabondo traktis min kun tiel granda kruelo, plene sufiĉos por forviŝi lin el mia memoro. Via moŝto permesu, ke mi retiru min, ke mi ne plu vidu antaŭ mi lian tristan figuron, aŭ, pli ĝuste, lian turpan kaj abomenan vizaĝon.

—Tio —rimarkis la duko— memorigas min pri la proverbo: «Kiu insultas, baldaŭ pardonas».

Altisidora ŝajnigis, ke ŝi forviŝas per sia naztuko larmojn, faris riverencon al la gedukoj kaj eliris el la ĉambro.

—Povra knabino! —diris Sancho—. Mi ŝin vere kompatas, ĉar ŝi havis la mavan sorton renkonti viron kun animo karde aspra kaj kun koro kverke dura. Se ŝi estus renkontinta min, tute alian finon havus ĉi afero!

Finiĝis la konversacio, don Quijote sin vestis, manĝis kun la gedukoj kaj foriris tiun saman vesperon.

Ĉapitro 71

Pri tio okazinta al don Quijote kaj Sancho survoje al ilia vilaĝo

La venkita kaj vojo-laca don Quijote rajdis parte ĝoja, parte trista. Li tristis pro sia venkiteco; kaj ĝojis, konsiderante la kapablon de Sancho, bone pruvitan per la resurekto de Altisidora, kvankam la hidalgo ne senrezerve persvadis sin, ke la pucelo vere kaj efektive mortis. Sancho montriĝis tute ne gaja, ĉar Altisidora ne plenumis sian vorton doni al li la ĉemizojn. Kaj cerbumante pri ĉi afero, li diris al sia mastro:

—Vere, sinjoro, mi estas sendube la plej senfortuna kuracisto de la mondo. Ekzistas doktoroj, kiuj mortigas siajn pacientojn kaj postulas pagon por tia laboro, kvankam ili sin limigas subskribi recepton por medikamentoj, kiujn faras, ne ili, sed la apotekisto. Bele, ĉu ne? Sed mi ricevas eĉ ne unu soldon, kvankam la resanigon de aliaj mi pagas per sango, skurĝadoj, naztordoj, pinglopiĝoj kaj pinĉoj. Nu, mi ĵuras je Dio, ke, se oni prezentos al mi alian malsanan personon, ke mi lin resanigu, oni devos antaŭe ŝmiri al mi la manojn: «la abato kantas, kie li manĝas», kaj mi ne volas kredi, ke la ĉielo dotis min per la kapablo, kiun mi posedas, por ke mi uzu ĝin favore al aliaj, senpage kaj por nenio.

—Vi pravas, amiko Sancho —respondis don Quijote—, kaj Altisidora kondukis riproĉinde, ne donante al vi la promesitajn ĉemizojn. Kvankam tian kapablon vi ricevis *gratis data*,^[423] kaj ne kiel rezulton de ajnaj studoj de via flanko, tamen havas pli da merito la sinofero de via persono ol la studado. De mia flanko mi diru, ke, se vi dezirintus pagon por la skurĝado necesa al la elsorĉo de Dulcinea, mi

ja pagus al vi ĝustan sumon. Sed mi ne scias, ĉu ĉi kuracado konsentas pagon, kaj mi ne dezirus, ke la rekompenco prenu de la medikamento ties efikon. Ĉiuokaze mi pensas, ke nenion oni perdas provante, do pensu kiom da mono vi volas, tuj skurĝu vin, kaj pagu vin kontante kaj propramane, ĉar vi portas kun vi mian monon.

Ĉe tiaj proponoj, la okuloj kaj oreloj de Sancho larĝiĝis ĝis la grandeco de unu spano, li konsentis en sia interno vipi sin, kaj diris:

—Nu, sinjoro, mi volonte komplezos vin, se mi profitos. La amo, kiun mi sentas al mia edzino kaj fioj, devigas min montriĝi zorga pri mia propra intereso. Via moŝto diru, kiom vi donus al mi por ĉiu vipobato.

—Sancho, se mi pagus al vi kiom meritas la grandeco kaj la kvalito de via servo —respondis don Quijote—, la trezoroj de Venecio aŭ la minoj de Potosí estus eta rekompenco. Kalkulu kiom da mono mia vi portas, kaj vi mem fiksu la prezon de ĉiu bato.

—La nombro de vipobatoj estas tri mil tricent kaj kelkaj: el ili mi donis al mi kvin kaj restas la ceteraj. Ni kalkulu, ke la kelkaj limiĝas al la kvin jam donitaj, do ni havas ĝuste trimil tricent. La prezo de ĉiu estu unu *cuartillo*^[424] (eĉ se la tuta mondo protestus, mi ne konsentus rabaton), do la tuto faras trimil tricent *cuartillos*. Nu, trimil *cuartillos* faras mil kvincent duonrealojn, aŭ sepcent kvindek realojn. La tricent *cuartillos* faras cent kvindek duonrealojn, aŭ sepdek kvin realojn. Kaj adiciante ĉi lastajn al la sepcent kvindek ni havas la sumon de okcent dudek kvin realoj. Tion mi subtrahos de la mono via, kiun mi portas kun mi, kaj mi iros hejmen riĉa kaj kontenta, kvankam bele tradraŝita, ĉar «kiun malĝojo ne turmentis, tiu ĝojon ne sentas».

—Ho, benata Sancho! Ho, kompleza Sancho! —kriis don Quijote—. Tiel profunda estos la dankemo de Dulcinea kaj de mi, ke ni servados vin, ĝis la ĉielo prenos de ni la vivon. Se ŝi rekiros sian veran figuron (kio nepre okazos) ŝia misfortuno turniĝos en feliĉon, kaj mia venkiteco en plej ĝuindan triumfon. Nu, Sancho, kiam vi deziras komenci vian vipadon? Por ke vi finu ĝin plej rapide, mi aldonas cent realojn.

—Kiam? —respondis Sancho—. Nepre ĉi-nokte. Via moŝto zorgu, ke ni tranoktu en la kamparo, sub la libera ĉielo, kaj mi ŝiros al mi la karnon.

Fine alvenis la nokto, kiun don Quijote atendis kun la plej granda senpacienco de la mondo, ĉar ŝajnis al li, ke la radoj de la ĉaro de Apolono rompiĝis, kaj ke la tago longiĝas pli ol kutime; li sentis do, same kiel la geamantoj, neniam kapablaj alĝustigi la tempon al siaj deziroj. Tiam ili rajdis en agrablan boskon, iom for de la vojo, senseligis la ĉevalon kaj la azenon, kuŝiĝis sur la freŝa herbo kaj manĝis el la viktualio de Sancho. Poste la ŝildisto faris specon de vipo forta kaj fleksebla el la kondukiloj de sia azeno, kaj retiris sin proksimume dudek paŝojn de sia mastro, inter kelkajn fagojn. Don Quijote, vidante lin iri kun brava decido, diris:

—Nu, amiko, ne ŝiru vin en pecojn. Faru tiel, ke estu paŭzo inter bato kaj bato. Ne urĝu vin en ĉi kurado ĝis la ekstremo, ke la spiro mankos al vi duonvoje; mi volas diri, ke vi ne batu vin tiel senkompate, ke vi perdu la vivon, antaŭ ol vi atingos la deziratan nombron da vergoj. Por ke vi ne eraru per bato plia aŭ malplia, mi nombros ilin de ĉi tie, helpe de la bidoj de mia rozario. La ĉielo vin favoru kiom via bona intenco meritas.

—Bona paganto ne zorgas pri garantiaĵoj — respondis Sancho—. Mi batos min tiamaniere, ke, sen mortigi min, mi

sentos la doloron. Certe, de tio dependas la efiko de ĉi miraklo.

Tuj poste li nudigis sin ĝis la zono, prenis la rimenojn, komencis frapi sin, kaj don Quijote komencis nombri la batojn. Sancho donis al si proksimume ses aŭ ok frapojn, kaj tiam, li trovis la aferon iom tro ĝena kaj la prezo tro modera. Tiel do li haltis momenton kaj diris al sia mastro, ke li faris eraron, ĉar ĉiu bato valoras, ne unu *cuartillo*, sed duonrealon.

—Daŭrigu, amiko Sancho —respondis don Quijote—, kaj ne perdu la kuraĝon. Mi duobligas la prezon.

—Se tiel, Dio min helpu, kaj la batoj pluvu sur min.

Sed la fripona ŝildisto ĉesis vipi sin sur la dorson, kaj, anstataŭe, punis la arbojn, ĵetante tiajn veojn de tempo al tempo, ke ŝajnis, ke lia animo elŝiriĝas el lia korpo. La tre sentema koro de don Quijote timis, ke la vivo de la ŝildisto estingiĝus, antaŭ ol finus la plenumon de sia tasko, do li diris:

—Je via vivo, amiko, ĉi medikamento ŝajnas al mi tro drasta kaj konvenas preni ĝin pli paŭzeme. «Oni ne konkeris Zamoran en unu horo».^[425] Sufiĉe do, por la momento. La azeno (se uzi komparon ne tre ĝentilan) eltenas la ŝarĝon, sed ne la superŝarĝon.

—Ne, ne, sinjoro —respondis Sancho—. Oni ne diru pri mi, ke «laboro pagita, manoj en ripozo». Apartiĝu iomete, kaj mi donos al mi almenaŭ mil novajn batojn. Per du pliaj serioj mi finos ĉi aferon, kaj ni havos eĉ surpluson da vergoj.

—Nu, se vi sentas vin en tiel bona spirit-stato —diris don Quijote—, la ĉielo vin helpu. Vipu vin. Mi jen apartiĝas.

Sancho rekomencis la interrompitan taskon kun tia energio, ke li baldaŭ debatis la ŝelon de multaj arboj: tiel rigore sin punis. Kaj denove levante la voĉon kaj samtempe donante teruran frapon al fago, li diris:

—Oj! Mi pereos!

Don Quijote tuj alkuris ĉe la sono de lia vea voĉo kaj de la bato de la rigora vipo, kaptis la retorditajn rimenojn skurĝe uzatajn de Sancho kaj diris:

—La ĉielo ne permesu, amiko Sancho, ke por mia persona plezuro vi perdu vian vivon, necesan por la subteno de viaj edzino kaj filoj. Dulcinea atendu pli bonan okazon, kaj mi tenos min inter la limoj de la espero, ĝis vi reakiros vian forton kaj finos ĉi aferon je ĉies kontento.

—Nu, se via moŝto tion deziras, mi volonte haltos — respondis Sancho—. Ĵetu vian mantelon sur mian dorson, ĉar mi ŝvitas kaj ne volas malvarmumi: la novicaj flagelantoj tion riskas.

Don Quijote obeis, demetis la mantelon, restis duonnuda en sia saĵo kaj kovris Sanchon, kiu dormis ĝis la suno vekis lin. Poste ili plu sekvis sian vojon, rajdis naŭ mejlojn, alvenis al vilaĝo, haltis tie kaj deseliĝis ĉe gastejo. Ĉi-foje don Quijote ne prenis ĝin por kastelo kun profunda foso, turoj, hersoj kaj levoponto, ĉar, de kiam oni lin venkis, li rivelis pli klaran juĝokapablon rilate al ĉio, kiel oni baldaŭ vidos. Oni lin gastigis en ĉambro, sur kies muroj pendis kelke da oldaj surpentritaj serĝoj, kiajn oni kutime renkontas en la vilaĝoj, anstataŭ ledaj tapiŝoj. Sur unu el la serĝoj vidiĝis, ege fuŝe pentrita, la forkapto de Helena, en la momento kiam ŝia aŭdaca gasto ŝin prenas de Menelao. Sur alia serĝo aperis la historio de Didona kaj Eneo: ŝi staris supre de alta turo kaj faris signalojn per la duono de litotuko al sia eskapanta

gasto, kiu fuĝis sur la maro en la fregato aŭ brigantino. Don Quijote rimarkis en la du bildoj, ke Helena lasas sin kapti sen tro granda ĉagreno, ĉar ŝi ridetis kaŝe kaj malicete, dum la bela Didona verŝis larmojn nukse grandajn. Ĉe tio, la hidalgo diris:

—Ĉi du sinjorinoj havis la grandan misfortunon ne vivi en nia epoko. Kaj mi, eĉ la pli grandan ne vivi en ilia tempo: se mi estus renkontinta ĉi du kavalirojn, tiam Trojo ne brulus, nek Kartago pereus, ĉar mi mortigus Parison, kaj sekve tiaj katastrofoj ne okazus.

—Mi vetus —diris Sancho—, ke antaŭ ne longe en ĉiuj tavernoj, gastejoj, drinkejoj kaj barbarejoj vidiĝos pentrita la historio de niaj faroj. Sed mi ŝatus admiri ĝin en bildoj faritaj de la mano de pentristo ne tiel fuŝa kiel la aŭtoro de ĉi figuroj.

—Vi pravas, Sancho —diris don Quijote—. Ĉi artisto similas al Orbaneja, pentristo de Úbeda. Kiam oni demandis al li, kion do li pentras, li respondis: «Mi ne scias. Ĉe la fino ni vidos». Se okaze li pentris kokon, li skribis sube: «Jen koko», por ke oni ne pensu, ke li pentris vulpon. Ŝajnas al mi, ke tiu speco de persono estas la pentristo aŭ verkisto (esence ili faras la saman laboron) kiu aperigis la historion de la nova don Quijote: li pentris aŭ skribis sen ia plano, laŭhazarde. Aŭ eble li similas al poeto nomata Mauleón, loĝanta en la ĉefurbo antaŭ kelkaj jaroj. Li respondis ĉian demandon sen heziti eĉ momenton, kaj foje, kiam oni demandis al li la signifon de «Deum de Deo»^[426], li respondis: «Donu blinde». Sed ni flanklasu ĉi aferon, kaj diru, Sancho, ĉu vi intencas doni al vi alian serion de vipobatoj ĉi-nokte, kaj ĉu vi deziras skurĝi vin sub la libera ĉielo aŭ sub tegmento.

—Vere, sinjoro —respondis la ŝildisto—, por tiaj batoj, kiujn mi donas al mi, same taŭgas la kamparo aŭ ia domo. Tamen

mi dezirus lokon inter arboj, ĉar ŝajnas, ke ili min akompanas, kaj grandioze helpas min elteni mian suferon.

—Ne, amiko Sancho, mi ne volas tion —diris don Quijote—. Por ke vi refortiĝu, atendu, ĝis ni troviĝos denove en nia vilaĝo, kien ni alvenos, plej tarde, postmorgaŭ.

Sancho respondis, ke li volonte obeas sian mastron, sed ke li dezirus fini ĉi aferon de la skurĝado kiel eble ple baldaŭ, kaj ke konvenas bati la feron, kiam ĝi estas varma, ĉar «en la prokrasto kuŝas danĝero», «preĝon faru, sed farunon preparu», «unu donaco valoras pli ol mil promesoj» kaj «prefere birdo en la mano ol vulturo fluganta».

—Je Dio, Sancho, ne pli da proverboj —diris don Quijote—. Oni pensus, ke vi faras *sicut erat*.^[427] Parolu simple, nature, sen komplikoj, kiel mi ofte konsilas al vi, kaj vi vidos, ke unu pano egalas al cent.

—Mi vere ne scias kio okazas al mi, sinjoro —respondis Sancho—. Mi ne povas diri du vortojn sen enmeti proverbojn, kaj ĉiam ili ŝajnas al mi laŭaj kaj oportunaj. Sed mi korektos min, se mi povos.

Kaj per tio finiĝis por la momento ilia konversacio.

[423] Latine: «kiel senpaga dono».

[424] Kvarono de realo.

[425] Proverba esprimo kun historia fono: atingi ion gravan kostas multe da klopodoj kaj penoj. Zamora estas hispana urbo, kiu apartenis al la antikva reĝlando Leono.

[[426](#)] Latine: «Dio de Dio», frazo el la katolika kredo-preĝo.

[[427](#)] Latine: «kiel antaŭe».

Ĉapitro 72

Pri kiel don Quijote kaj Sancho alvenis al sia vilaĝo

La hidalgo kaj la ŝildisto pasigis la tagon en tiu vilaĝo kaj gastejo, atendente la nokton: Sancho, por plenumi ĝisfine sian skurĝadon en la kamparo kaj sub la libera ĉielo, kaj don Quijote, por vidi la atingon de sia deziro per la kompletigo de lia puno. Tiam alvenis al la gastejo unu surĉevala vojaĝanto kun tri kvar servistoj, kaj unu el ĉi lastaj diris al sia sinjoro:

—Via moŝto, sinjoro don Álvaro Tarfe, povas siesti ĉi tie: la gastejo ŝajnas pura kaj freŝa.

Tion aŭdinte, don Quijote diris al Sancho:

—Aŭskultu, Sancho: kiam mi foliumis la libron kun la dua parto de mia historio, mi trafis, se mi bone memoras, la nomon de don Álvaro Tarfe.

—Eble temas pri la sama persono —respondis Sancho—. Kiam li deseliĝos, ni demandos al li.

La rajdanto deseliĝis, kaj la gastejestrino donis al li ĉambron en la ĉefetaĝo, rekte kontraŭan al la ĉambro de don Quijote, same garnitan per surpentritaj serĝoj. La ĵusveninto ŝanĝis sian veston por alia pli leĝera, propra al la somero, eliris al la gasteja vestiblo, larĝa kaj freŝa, kie don Quijote promenis, kaj demandis:

—Kien vojaĝas via moŝto, sinjoro hidalgo?

—Al proksima vilaĝo, kie mi loĝas —respondis don Quijote—. Kaj, kien iras via moŝto?

—Al Granada, mia urbo —respondis la alia.

—Vere bona urbo. Sed bonvolu diri vian nomon, ĉar ĝi estas por mi pli grava, ol mi povus klarigi.

—Mi nomiĝas don Álvaro Tarfe —respondis la nova gasto.

—Tiel do, via moŝto sendube estas la sama don Álvaro Tarfe, kies nomo aperas en la ĵus presita *Dua parto de la historio de don Quijote de La Mancha*, eldonita de moderna aŭtoro.

—Jes, mi mem —respondis don Álvaro—, kaj don Quijote, ĉefa protagonisto de la historio, estis mia granda amiko. Mi igis lin eliri el sia vilaĝo, aŭ, almenaŭ, mi persvadis lin iri partopreni en la turniroj de Zaragoza, kien mi mem vojaĝis. Vere, mi faris al li multe da favoroj, kaj, dank' al mi, la ekzekutisto ne karesis lian dorson pune pro lia troa aŭdaco.

—Diru, sinjoro don Álvaro —demandis la hidalgo—. Ĉu mi iel similas tiun don Quijote, pri kiu vi parolas?

—Ne —respondis don Álvaro—. Tute ne.

—Kaj via don Quijote... ĉu li havis ŝildiston nomatan Sancho Panza?

—Jes, li tenis —respondis don Álvaro—. Kaj, kvankam li havis la famon esti tre sprita, neniam mi aŭdis lin diri ion amuzan.

—Tion mi kredas —intervenis Sancho—. Ne ĉiuj kapablas spritumi, kaj via Sancho, sinjoro kavaliro, sendube estas unuaranga fripono, kreteno kaj latrono en unu sama persono. Ĉar jen, mi estas la vera Sancho kaj havas pli da sprito, ol pluvo gutojn. Nu, via moŝto submetu min al provo:

venu post mi dum proksimume unu jaro, kaj vi vidis kiom da spritaĵoj falas de mi ĉiupaŝe. Tiel multaj kaj tiel bonaj, ke plej ofte, eĉ sen mem scii kion mi diras, mi igas ridi la aŭskultantojn. Kaj la vera don Quijote de La Mancha, la fama, la kuraĝa, la saĝa, la amanto, la riparanto de arbitroj, la kuratoro de zorgatoj kaj orfoj, la ŝildo de vidvinoj, la murdisto de puceloj,^[428] la viro, kiu havas la senegalan Dulcinea de El Toboso kiel ununuran damon, estas ĉi sinjoro, mia mastro. Alia ajn don Quijote, kaj alia ajn Sancho estas mistifiko kaj fantazio.

—Je Dio, mi kredas vin —respondis don Álvaro—, ĉar en viaj kelkaj vortoj vi metis pli da spritaĵoj, ol la alia Sancho en siaj konversacioj. Kaj el ĉi lastaj mi aŭdis multajn. Li estas pli manĝ-avida ol amuza, kaj pli stulta ol sprita. Kaj sendube, la sorĉistoj persekutantaj don Quijote la bonan, persekutis ankaŭ min per don Quijote la mava. Sed mi ne scias kion pensi, ĉar mi ĵurus, ke mi lasis lin enfermita en la frenezulejo de Toledo, por ke oni lin flegu, kaj jen aperas alia don Quijote, kvankam tre diferenca de la mia...

—Mi ne scias, ĉu mi estas bona —diris la hidalgo—, sed povas aserti, ke mi ne estas la mava don Quijote. Pruve de tio, mi volas, ke vi sciu, sinjoro don Álvaro Tarfe, ke neniam en mia vivo mi vizitis la urbon Zaragoza. Kontraŭe: kiam oni diris al mi, ke la fikcia don Quijote partoprenis en ĝiaj turniroj, mi decidis ne eniri en la urbon, por tiel proklami antaŭ la tuta mondo la mensogon de lia personeco, kaj plu vojaĝis rekte al Barcelona, tabernaklo de ĝentilo, rifuĝo de homoj alilandaj, hospitalo de paŭperaj, lando de kuraĝaj, venĝanto de ofenditaj, loko de nobla kaj reciproka amikeco; kaj urbo unika pro ties belo kaj situo. Kaj, kvankam la aventuroj min trafintaj tie donis al mi, ne plezuron, sed grandan aflikton, tamen la nura fakto, ke mi vizitis la urbon, tre helpis min elteni mian misfortunon. Efektive, sinjoro don Álvaro Tarfe, mi estas don Quijote de La Mancha (pri kies

faroj parolas la famo), ne la mizera ulo, kiu volis uzurpi mian nomon kaj honori sin per miaj pensoj. Mi do suplikas vian moŝton, ĉar vi estas kavaliro, ke, antaŭ la ĉi-tiea vilaĝestro, vi bonvolu fari deklaron pri tio, ke en mia tuta vivo vi neniam vidis min ĝis hodiaŭ, ke mi ne estas la don Quijote aperanta en la dua parto, kaj ke ĉi Sancho Panza, mia ŝildisto, ne estas la Sancho, kiun vi konis.

—Tre volonte mi faros tion —respondis don Álvaro—, ĉar kaŭzas admiron vidi samtempe du don Quijotes kaj du Sanchos tiel egalaj laŭ la nomoj kaj tiel diferencaj laŭ la faroj. Kaj mi denove diras kaj konfirmas, ke mi ne vidis kion mi vidis, kaj ke, kio okazis al mi, tio ne okazis.

—Sendube —diris Sancho— via moŝto estas ensorĉita kiel mia sinjorino Dulcinea de El Toboso. Se la ĉielo volus, ke la elsorĉo de via moŝto dependus de tio, ke mi donu al mi aliajn tri mil kaj kelke da vergoj, kiel mi faras por Dulcinea, mi tre volonte punus min, sen postuli ian rekompencan.

—Tion pri la vergoj mi ne komprenas —diris don Álvaro.

Sancho respondis, ke temas pri longa historio, sed ke li rakontus ĝin, se hazarde ili sekvas la saman vojon.

Alvenis la manĝo-horo, kaj don Quijote kaj don Álvaro manĝis kune. La vilaĝestro okaze eniris en la gastejon kun unu aktisto, kaj tiam don Quijote kaptis la okazon fari al li la laŭrajtan peton, ke li ricevu de don Álvaro de Tarfe, la kavaliro tie troviĝanta, la deklaron, ke la menciita sinjoro neniam antaŭe konis don Quijote de La Mancha, same tie troviĝanta, kaj ke ne temas pri li la historio titolita *Dua parto de don Quijote de La Mancha*, verkita de iu Avellaneda el la vilaĝo Tordesillas. Nu, la vilaĝestro procedis laŭjure, kaj la deklaron oni faris, plenumante ĉian formalajn, je la granda ĝojo de don Quijote kaj Sancho, kvazaŭ la dokumento estus

al ili tre grava, kaj la faroj kaj diroj de la du Sanchos kaj de la du don Quijotes ne klare montrus la diferencon inter ili. La du kavaliroj interŝanĝis multe da esprimoj de ĝentilo kaj bonvolo, kaj la heroo de La Mancha rivelis tiel grandan saĝon kaj prudenton, ke don Álvaro Tarfe definitive konvinkiĝis pri sia eraro, kaj eĉ suspektis, ke vere oni lin ensorĉis, se konsideri, ke li konis tute de proksime du tiel diferencajn don Quijotes. Alvenis la vespero, ili ekiris de la vilaĝo, kaj je la distanco de proksimume unu mejlo kaj duono, la vojo duiĝis: unu branĉo kondukis al la vilaĝo de don Quijote, kaj la alia branĉo estis la vojo sekvenda de don Álvaro. Dum la kurta tempo pasinta ĝis ili alvenis tien, don Quijote rakontis al don Álvaro la misfortunon de sia malvenko, la ensorĉitecon de Dulcinea, kaj la rimedon por ŝia elsorĉo, ĉe kio don Álvaro denove miris. Li brakumis la hidalgon kaj la ŝildiston kaj sekvis sian vojon. Don Quijote sekvis la sian kaj tranoktis inter arboj por doni okazon al Sancho plenumi sian pentofaron. La ŝildisto plenumis ĝin kiel en la antaŭa nokto, t.e. je la kosto de la ŝeloj de la fagoj; kaj tiel bone li traktis sian dorson, ke, se muŝo sidus sur ĝi, la skurĝado tute ne ĝenus la muŝeton. La trompita don Quijote ne preterlasis en sia nombrado eĉ unu solan baton, kaj trovis, ke, kun la tuta serio de la antaŭa nokto, la vipobatoj atingis la nombron de tri mil dudek naŭ. Ŝajne la suno leviĝis pli frue por spekti la oferon, kaj en ĝia lumo la hidalgo kaj la ŝildisto daŭrigis la vojaĝon, parolante pri la eraro de don Álvaro kaj pri tio, ke ili bone faris, kiam ili petis lian oficialan deklaron antaŭ la aŭtoritatoj.

La tutan tagon kaj nokton ili pasigis, sen ke io rimarkinda okazus, se escepti, ke Sancho kompletigis sian taskon je la eksterordinara ĝojo de don Quijote, kiu atendis la alvenon de la mateno por vidi, ĉu li trovus sur la vojo sian sinjorinon Dulcinea jam elsorĉita. Kaj, sekvante sian vojaĝon, ĉiufoje kiam li renkontis virinon, li proksimiĝis al ŝi, kun la ideo, ke

ŝi povus esti Dulcinea de El Toboso, ĉar li opiniis la promeson de Merlín nepre plenumenda.

Kun ĉi pensoj kaj deziroj ili surpriris monteton, kaj de tie distingis sian vilaĝon. Sancho genuiĝis kaj diris:

—Apertu la okulojn kaj vidu, kara lando, ke via filo Sancho Panza revenas, se ne riĉa, tamen forte trabatita. Disetendu la brakojn kaj same akceptu vian filon don Quijote, kiu, kvankam venkita de fremda brako, ankaŭ li venkis, almenaŭ sin mem; kaj, laŭ liaj asertoj, tia venko estas plej dezirinda. Monon mi portas, ĉar oni min tradraŝis ofte, sed mi rajdis kavalire.^[429]

—Sufiĉe jam! —diris don Quijote—. Ĉesu diri stultaĵojn, kaj ni eniru dekstrapiede^[430] en nian vilaĝon. Tie ni lasos nian imagon libere kuri kaj elpensi la manieron, kiel ni vivos nian paŝtistan vivon.

Tuj sekve ili descendis la deklivon kaj sin direktis al la vilaĝo.

[428] Sarkasmo de Sancho, aluda al la «morto» de Altisidora pro la disdegno de don Quijote.

[429] Du versoj de olda romano, cititaj de Sancho kun ironia nuanco.

[430] Eniri ien per la dekstra piedo donis bonan sorton, laŭ superstiĉa kredo.

Ĉapitro 73

Pri la omenoj renkontitaj de don Quijote en la momento de lia eniro en la vilaĝon, kaj pri aliaj eventoj, kiuj garnas kaj konfirmas ĉi grandan historion

Rakontas Cide Hamete, ke, enirante en la vilaĝon, don Quijote vidis, ke en la komunuma draŝ-kampo kverelas du knaboj. Unu diris al la alia:

—Ne insistu, Periquillo. Neniam en via vivo vi revidos ĝin.

Don Quijote tion aŭdis kaj diris al Sancho:

—Ĉu vi ne rimarkis, amiko, kion ĵus diris ĉi knabo: «neniam en via vivo vi revidos ĝin»?

—Nu bone, kaj kio? —respondis Sancho.

—Kio? Ĉu vi ne komprenas, ke, aplikante liajn vortoj al mia kazo, ili signifas, ke mi neniam revidos Dulcinean?

Sancho pretis respondi, sed fine ne parolis, ĉar subite li vidis veni al ili leporon, persekutatan de multaj levreloj kaj ĉasistoj. La besteto, timotrema, rifuziĝis kaŭre sub la piedoj de la azeno, Sancho prenis ĝin sen ia peno kaj ĝin prezentis al sia mastro, kiu diris:

—*Malum signum, malum signum.*^[431] Leporo fuĝas. Levreloj ĝin sekvas, Dulcinea ne aperas.

—Vere stranga estas via moŝto —diris Sancho—. Ni supozu, ke ĉi leporo estas Dulcinea de El Toboso; ĉi levreloj, la

friponaj sorĉistoj transformintaj ŝin en kampulinon; ŝi forkuras, mi ŝin kaptas kaj metas ŝin en viajn manojn. Kaj vi tenas ŝin en viaj brakoj kaj ŝin karesas. Kie do la omeno, kaj kiam mavan aŭguron vi prenas de ĉio ĉi?

La du knaboj, kiu kverelis, proksimiĝis vidi la leporon, kaj Sancho demandis al unu el ili, kial ili disputis. La knabo dirinta: «Neniam mi revidos ĝin», respondis, ke li prenis de la alia bubo grilo-kaĝon, kaj ke li intencas neniam redoni ĝin al li. Sancho elpoŝigis kvar soldojn, donis ilin al la knabo por la kaĝo, kaj metis ĝin en la manojn de don Quijote, dirante:

—Sinjoro, jen frakasitaj kaj detruitaj ĉi omenoj, kiuj, laŭ mia modesta opinio, ne havas pli da rilato kun nia sorto, ol la pasint-jaraj nuboj. Se mi bone memoras, iam mi aŭdis diri la pastron de nia vilaĝo, ke ne apartenas al kristanaj kaj diskretaj personoj zorgi pri tiaj absurdoj. Kaj eĉ via moŝto diris al mi la samon antaŭ ne longe, komprenigante al mi, ke la kristanoj, kiuj serioze konsideras la omenojn, estas stultaj. Sed ne necesas insisti nun pri ĉi afero: ni iru antaŭen al nia vilaĝo.

Alvenis la ĉasistoj, petis sian leporon, kaj don Quijote ĝin donis al ili. La hidalgo kaj la ŝildisto plu rajdis kaj, enirante en la vilaĝon, vidis, ke la bakalaŭro Sansón Carrasco kaj la pastro preĝas en herbejo. Nu, oni sciu, ke Sancho Panza jam pli frue metis sur la azenon kaj sur la kunligitan armaĵon la robon el fusteno kun surpentritaj flamoj, kiun li mem surhavis en la kastelo de la duko, en la nokto de la resurekto de Altisidora. Li same surmetis sur la kapon de la azeno la kartonan mitron, kio transformis la bruton en la plej strangan kvarpiedulon de la mondo. La pastro kaj la bakalaŭro tuj rekonis ilin kaj alkuris kun apertaj brakoj ilin bonvenigi. Don Quijote deseliĝis kaj forte ilin brakumis. Dume la buboj, kies linkaj okuloj nenion preteratentas, vidis

la mitron de la azeno kaj alkuris admiri ĝin, dirante unu la alian.

—Venu, knaboj, kaj vi vidos la azenon de Sancho pli eleganta ol Mingo,^[432] kaj la ĉevalon de don Quijote pli skeleta ol iam antaŭe.

Fine, ĉirkaŭate de buboj kaj en akompano de la pastro kaj bakalaŭro, ili eniris en la vilaĝon kaj sin direktis al la domo de don Quijote, ĉe kies pordo atendis la mastrumantino kaj la nevino, ĉar ili jam sciis la novaĵon pri la alveno de la paro. Ankaŭ Teresa Panza edzino, de Sancho, estis informita, kaj duonnuda kaj kun senordaj haroj, tirante je la mano sian filinon Sanchica, alkuris renkonti sian edzon. Kaj vidante, ke li aspektas ne tiel bone kiel —ŝi pensis— devus aspekti gubernatoro, ŝi demandis:

—Edzo, kial vi venas piede kaj trenante vin, kiel laca hundo? Jen bela figuro de gubernatoro!

—Silentu, Teresa —respondis Sancho—. Ofte, kie videblas hokoj, ili aperas sen ŝinkoj. Sed ni iru hejmen, kaj mi rakontos al vi nombron da mirindaj aferoj. Mi portas monon kun mi, kio estas plej grava, gajnitan per propra penado kaj sen damaĝi ajnan personon.

—Se vi portas monon —diris Teresa— mi ne zorgas, kie kaj kiel vi ĝin gajnis. Certe vi elpensis nenian novan manieron ĝin akiri.

Sanchica brakumis sian patron, demandis, ĉu li alportas ion al ŝi, kaj aldonis, ke ŝi atendis lin, kiel oni atendas la pluvon en majo. Teresa prenis lin je la mano, Sanchica kroĉiĝis al lia zono kaj samtempe tiris la azeno je la kondukiloj, kaj tiel ili tri iris hejmen, lasinte la hidalgon en ties domo, sub la

prizorgo de la mastrumantino kaj la nevino kaj en akompano de la pastro kaj la bakalaŭro.

Don Quijote, senrigarde al la horo aŭ al la ceteraj cirkonstancoj, tuj enfermis sin kun la bakalaŭro kaj la pastro kaj koncize rakontis al ili pri sia malvenko kaj pri sia promeso ne eliri el la vilaĝo dum unu jaro, kion li pensis rigore observi, sen devii de ĉi devo eĉ per unu atomo, en obeo al la reguloj de la vaganta kavalirismo. Li aldonis, ke li intencas paŝtisti dum la menciita jaro kaj pasigi la tempon en la soleco de la kampoj, kie li povus doni liberon al siaj amaj pensoj, okupante sin samtempe per la virta metio paŝtista. Li suplikis ilin esti liaj kompanoj, se ili ne havus multon por fari, kaj se aferoj pli gravaj ne retenus ilin, kaj diris ankaŭ, ke li aĉetos nombron da ŝafinoj kaj aliaj brutoj necesaj por ilia paŝtista profesio, kaj ke la ĉefa parto de la afero estas jam solvita, ĉar li trovis por siaj kompanoj plej adekvatajn nomojn. La pastro demandis al li pri tiaj nomoj, kaj don Quijote respondis, ke li nomiĝos paŝtisto Quijotiz; la bakalaŭro, paŝtisto Carrascón; la pastro, paŝtisto Pastriambro; kaj Sancho Panza, paŝtisto Pancino. La bakalaŭro kaj la pastro miris je la nova frenezo de don Quijote, sed, por ke ne venu al li la penso denove forlasi la vilaĝon por vagadi kavalire, ambaŭ aprobis lian novan intencon, aplaudis ĝin kiel saĝan, kaj akceptis paŝtisti kun li, en la espero, ke la hidalgo povus resaniĝi kun la paso de la jaro.

—Tre bona ideo —diris Sansón Carrasco—. Des pli, ke mi estas eminentega poeto, kiel jam scias la tuta mondo, kaj ofte verkos pastoralojn, kortezajn versojn aŭ ion ajn laŭ mia plaĉo, kaj tiel ni distros nin en la solecaj lokoj, kie ni vagados. Sed la plej necesa afero estas, sinjoroj, ke ĉiu el ni elektu la nomon de la paŝtistino, kies belon li prikantos en siaj versoj, kaj ke ne restu eĉ unu sola arbo, eĉ la plej dura,

sen ke ni enskribu kaj entrancu ŝian nomon en la ŝelon, laŭ la kutimo de la am-frapitaj paŝtistoj.

—Grandioze! —kriis don Quijote—. Tamen, mi ne bezonas elpensi la nomon de paŝtistino, se konsideri, ke mi havas la personon de Dulcinea de El Toboso, gloro de ĉi bordoj, garno de ĉi herboj, modelo de beleco, kremo de ĉarmo kaj, unuvorte, subjekto plej inda je ĉiaj laŭdoj, eĉ hiperbolaj.

—Efektive, vi pravas —diris la pastro—. Sed ni serĉos ĉirkaŭe komplezajn paŝtistinojn, ke ili plaĉu al ni iel aŭ alie.

—Kaj se ni ne trovos ilin —diris la pastro —aldonis Sansón Carrasco—, ni uzos la nomojn de la paŝtistinoj tiel ege abundaj en la mondo de la libroj: Fílida, Amarilis, Diana, Florida, Galatea, Belisarda... Nu, se oni vendas ilin en la bazaro, ni povos facile ilin aĉeti kaj teni ilin kun ni, kiel niaj. Se mia damo, aŭ pli ĝuste, mia paŝtistino, nomiĝos Ana, mi ŝin prikantos sub la nomo Anarda; se Francisca, mi nomos ŝin Fracenan, kaj, se Lucía, Lucinda: ne komplika afero. Kaj Sancho Panza, se li eniros en nian kunfrataron, povos prikanti sian edzinon Teresa Panza sub la nomo Teresaina.

Don Quijote ridis je la modifo de la nomo, la pastro senfine laŭdis lin pro ties honesta kaj honorinda decido kaj ripetis sian proponon akompani lin tiel longe, kiel liaj neeviteblaj devoj permesus. Tuj poste la bakalaŭro kaj la pastro adiaŭis, konsilante al la hidalgo flegi sian sanon kaj manĝi laŭkonvene.

Nu, la sorto volis, ke la mastrumantino kaj la nevino aŭdu ĉi konversacion, kaj, tuj kiam la vizitantoj foriris, la du virinoj eniris en la ĉambron de don Quijote, kaj la nevino diris:

—Kion signifas ĉio ĉi, sinjoro onklo? Nun, kiam ni pensis, ke via moŝto revenis por sidi hejme kaj vivi ĉi tie trankvilan kaj decan vivon, vi intencas puŝi vin en novan labirinton, en la

rolo de paŝtisto, «kiu vagas ire vene».^[433] Sed, se diri la veron, onklo, via spino jam tro rigidas por tia laboro.

Al tio la mastrumantino aldonis:

—Ĉu via moŝto eltenos la varmon de la posttagmezoj en la somero, la froston de la vintraj noktoj kaj la hurlon de la lupoj? Certe ne, ĉar tio estas ofico kaj laboro de fortaj kaj harditaj personoj, preparataj por tia tasko preskaŭ detempe de iliaj bebaj jaroj. Nu, el la du malbonoj, prefere estis vaganta kavaliro ol paŝtisto. Sekvu mian konsilon, sinjoro: mi donas ĝin al vi, ne kun la stomako plena de vino kaj pano, sed faste kaj kun la sperto de miaj kvindek jaroj: sidu hejme, prizorgu vian bienon, ofte konfesu en la kirko, helpu la paŭperajn, kaj se ĉio ĉi donos al vi mavan rezulton, mia animo suferu.

—Silentu, filinoj —respondis don Quijote—. Mi tre bone scias kion mi devas fari. Konduku min al la lito, ĉar ŝajnas al mi, ke mia sano ne estas tute en ordo. Kaj ne dubu ke, kiel vaganta kavaliro aŭ kiel paŝtisto, mi ĉiam helpos vin ambaŭ en viaj bezonoj, kiel mi pruvos per miaj agoj.

La bonaj filinoj (ĉar vere la mastrumantino kaj la nevino kondukis filinece) kondukis lin al la lito, kie ili donis al li iom da manĝo kaj lin regalis laŭeble.

[431] Latine: mava, misaŭgura signo.

[432] Proverba esprimo: vere danda. Mingo estas mallongigo de Domingo (Dominiko).

[433] Verso de olda romanco aŭ de Kristnaska kanto.

Ĉapitro 74

Pri la malsaniĝo, testamento kaj morto de don Quijote

La aferoj de ĉi mondo, precipe la vivo de la homoj, ne estas eternaj kaj, jam de la komenco, dekadencas ĝis la lasta fino. Kaj tial, ke la vivo de don Quijote ne ricevis de la ĉielo la privilegion eskapi de ĉi nepra proceso, lia fino kaj pereco alvenis, kiam li tute ne atendis ĝin. Ĉu pro la melankolio kaŭzita de lia venkiteco, ĉu pro decido de la ĉielo, lin trafis febro kaj tenis en la lito ses tagojn, en kies tempo lin ofte vizitis liaj amikoj la pastro, la bakalaŭro kaj la barbiro. Kaj lia bona ŝildisto Sancho Panza eĉ ne unu momenton retiriĝis de apud la lito de la hidalgo. Liaj amikoj kredis, ke la aflikto pro lia venkiteco, kaj la fakto, ke la elsorĉo kaj liberigo de Dulcinea ne plenumiĝis, kulpas je lia stato, do ili klopodis ĉiamaniere revigligi lin. La bakalaŭro suplikis lin animiĝi, leviĝi de la lito kaj komenci sian paŝtistan vivon, kaj aldonis, ke ĉi-rilate li jam komponis eklogon, kies merito metus en ombron ĉion verkitan de Sannazaro,^[434] kaj ke li jam aĉetis el propra poŝo, disde grego-posedanto de Quintanar, paron da bonegaj gard-hundoj nomataj Barcino kaj Butrón. Sed, malgraŭ ĉio, la deprimado de don Quijote persistis. Liaj amikoj venigis la kuraciston: li palpis lian pulson, trovis ĝin tre neregula kaj diris, ke, se konsideri ĉion, la hidalgo devus atenti la savon de sia animo, ĉar la sano de lia korpo estas en granda danĝero. Don Quijote aŭskultis la rekomendon kun trankvila mieno, sed la mastrumantino, la nevino kaj la ŝildisto komencis kortuŝe plori, kvazaŭ ili vidus lin morta. La kuracisto opiniis, ke aflikto kaj despero konsumas lian vivon. Don Quijote petis, ke oni lasu lin sola, ĉar li deziras iom dormi. Liaj amikoj obeis, kaj li dormis unutage, kiel oni diras,

pli ol ses sinsekvaj horojn: tiom, ke la mastrumantino kaj la nevino pensis, ke li ne vekigus el sia dormo. Sed ĉe la fino de la dirita tempo li apertis la okulojn kaj diris laŭte:

—Estu benata la ĉiopova Dio, kiu faris al mi tiel grandan bonon! Lia mizerikordo ne havas limojn, kaj la pekoj de la homoj ne povas ĝin obstakli aŭ forteni.

La nevino aŭskultis kun atento la vortojn de sia onklo, pensis, ke ili ŝajnas pli raciaj ol liaj kutimaj diroj, kaj demandis:

—Kion vi diras, sinjoro? Ĉu io okazas al vi? Pri kiaj mizerikordoj kaj pri kiaj pekoj de la homoj vi parolas?

—Temas pri la mizerikordo, kiun mi ricevis de Dio ĉi-momente. Kaj, kiel mi diris, miaj pekoj ne povis obstakli, ke ĝi min trafis. Mi retrovis mian racion, jam liberan kaj klaran, sen la densa nebulo de la nescio, kiun ĵetis sur min mia stulta kaj konstanta lego de la abomenindaj libroj kavaliraj. Mi jam konas iliajn absurdojn kaj trompojn, kaj bedaŭras nur, ke ĉi scio venis al mi tiel tarde, ke mi ne havas tempon sufiĉan por legi kompanse aliajn librojn bonajn por la animo. Mi sentas min, nevino, sur la rando de la morto, kaj mi ŝatus renkonti ĝin tiamaniere, ke la mondo komprenu, ke mia vivo ne estis mava ĝis la ekstremo doni al mi reputacion de frenezulo: ĉar, kvankam freneza, mi ne volus, ke mia morto konfirmu tian fakton. Venigu, kara nevino, miajn bonajn amikojn: la pastron, la bakalaŭron Sansón Carrasco kaj majstron Nicolás, ĉar mi deziras konfesi miajn pekojn kaj fari mian testamenton.

Sed la nevino ŝparis al si voki, ĉar la tri eniris tiam en la ĉambron. Don Quijote, vidante ilin tuj diris:

—Gratulu min, amikoj, ĉar mi estas, ne plu don Quijote de La Mancha, sed Alonso Quijano, iam alnomata «la bona» pro

mia vivmaniero. Mi oponas nun al Amadís de Gaŭlio kaj al la senlima kaj aĉa idaro de lia familio, konas mian frenezon, abomenas la tuton de la profanaj historioj kavaliraj, kaj konscias la grandan danĝeron, kien mi falis, legante ilin. Mi ricevis amare instruan lecionon el propra sperto, kaj nun, dank' al la mizerikordo de Dio, rekonas ilian abomenindecon.

Aŭdante tion, la tri amikoj sendube kredis, ke lin posedas alia nova frenezo, kaj Sansón diris:

—Ĉu vi komunikas tion al ni, en la momento kiam ni ĵus eksciis, ke oni jam elsorĉis Dulcinean? Ĉu vi decidis fariĝi ermito, en la momento kiam ni komencos paŝtisti kaj vivi kantante, kiel princoj? Je Dio, rekonsciigu, kaj ne diru tiom da absurdoj.

—Ĉu absurdoj? Ĝis nun, kaj por mia damaĝo, ili estis tro realaj. Sed kun la helpo de la ĉielo, mia forpaso igos ilin favoraj al mi. Amikoj, mi sentas, ke mi rapide mortas. La ŝercoj ĉesu, bonvolu voki pastron, ke mi konfesu kun li, kaj aktiston, ke li redaktu mian testamenton: ĉar en gravaj momentoj, kiel la nuna, oni ne devas ŝerci kun la animo. Do, mi suplikas, ke dum la sinjoro pastro konfesprenos min, oni venigu la aktiston.

La amikoj de don Quijote rigardis sin reciproke, plenaj je miro ĉe la vortoj de la hidalgo, kaj, kvankam ne senrezerve, ili inklinis kredi lin. Ili konjektis, ke lia morto proksimas, ĉar, inter aliaj simptomoj, lia frenezo tiel rapide turniĝis en saĝon. Al siaj jam menciitaj vortoj. Don Quijote aldonis multe da aliaj tiel trafaj, prudentaj kaj kristanaj, ke liaj amikoj fine konvinkiĝis, sen ombro da dubo, ke la menso de la hidalgo sanas denove. La pastro igis eliri ĉiujn el la ĉambro, restis sola kun li, kaj lin konfesprenis. La bakalaŭro iris serĉi la aktiston kaj iom poste revenis kun li kaj kun Sancho Panza. La ŝildisto, informita de la bakalaŭro pri la

stato de la hidalgo, trovis la mastrumantinon kaj la nevinon duonplorantaj, kaj tiam li komencis aflikte snufeti kaj verŝi larmojn.

Finiĝis la konfesprezo, kaj la pastro eliris dirante:

—Li vere mortas; kaj vere havas sanan menson Alonso Quijano la bona. Nu, oni eniru, ke li testamentu.

Ĉi vortoj donis teruran puŝon al la okuloj, gravedaj je larmoj, de la mastrumantino, la nevino kaj Sancho Panza, tiel fortan, ke ili eksplodis en ploradon, dum ilia brusto elĵetis mil profundajn suspirojn. Ĉar, kiel jam dirite kelkfoje, en la tempo kiam don Quijote estis simple nur Alonso Quijano la bona, kaj en la tempo, kiam li estis don Quijote de La Mancha, la hidalgo havis ĉiam agrablan karakteron kaj amikeman spiriton, kaj sekve amis lin, ne nur liaj hejmanoj, sed ĉiuj lin konantaj.

La aktisto eniris kun la aliaj, kaj don Quijote, post ol oni skribis la unuan, rutinan parton de la testamento kaj de la kutimaj formuloj kristanaj, diktis jene, en la sekcio de la legacioj:

«*Item*,^[435] rilate al certa mono nuntempe en posedo de Sancho Panza (kiun, en mia frenezo, mi faris mia ŝildisto), mi volas, ke tial, ke inter ni ekzistas kelke da kontoj ne tute klaraj, oni ne petu, ke li ĝin redonu: kontraŭe, se post ol li pagos al si sian salajron, restos ioma kvanto, ĉi kvanton, certe tre etan, li retenu kiel sian, kaj ĝi faru al li bonon. Kaj se en la tempo de mia frenezo mi povis doni al li la gubernatorecon de insulo, nun, kiam mi ĝuas sanan menson, mi donus al li, se mi povus, la tronon de regno, ĉar tion meritas lia simpla kaj lia fidela konduto.

Kaj, turnante sin al Sancho, li daŭrigis:

—Pardonu min, amiko, ke mi igis vin fali en la eraron, ke ekzistis kaj ekzistas en la mondo vagantaj kavaliroj, kaj ke, pro mia kulpo, vi ŝajnis tiel freneza kiel mi.

—Ho ve! —respondis Sancho, plorante—. Via moŝto ne forpasu, sinjoro: kontraŭe, sekvu mian konsilon kaj vivu ankoraŭ multe da jaroj, ĉar la plej granda frenezaĵo, kiun homo povas fari en ĉi vivo, estas sin forlasi al la morto, sen ke neniuj mortigu lin, kaj sen ke aliaj manoj lin sufoku, se escepti la manojn de la melankolio. Nu, ne pigru, ellitiĝu, kaj ni iru en paŝtistaj kostumoj al la kamparo, kiel interkonsentite. Eble ni trovos malantaŭ la arbusto Dulcinean jam senmanke elsorĉita. Se vi mortas de la aflikto vidi vin venkita, ĵetu sur min la kulpon, dirante, ke oni vin renversis, ĉar mi fuŝe alĝustigis la ventrobendon de Rocinante. Cetere, via moŝto scias per viaj libroj kavaliraj, ke ordinare unu kavaliro faligas alian, kaj ke la hodiaŭa venkito povas siaflanke venki morgaŭ.

—Prave dirite —aldonis Sansón—. La bona Sancho diris nur la veron.

—Sinjoroj —respondis don Quijote—. Ne iru tiel rapide, ĉar la nestoj pasintjaraj ne havas ovojn ĉi-jare. Mi perdis la racion kaj ĝin retrovis. Mi estis don Quijote de La Mancha kaj estas nun, kiel dirite, Alonso Quijano la bona. Mia sincera pentopovu gajni denove vian estimon al mia persono. Nu, la sinjoro aktisto plu skribu: «*Item*, mi testamentas mian tutan havon al mia nevino Antonia Quijano, ĉi tie troviĝanta, post ol oni deprenos de la dirita haveco ĉion necesan por la plenumo de miaj legacioj. Kaj mi deziras, ke, unue, oni pagu la salajron, kiun mi ŝuldas al mia mastrumantino por la tuta tempo de ŝia servado, plus dudek dukatojn, por ke ŝi aĉetu al si novan robon. Mi nomas la sinjoron pastron kaj la sinjoron bakalaŭron Sansón Carrasco testamentaj administrantoj. *Item*, estas mia volo, ke, se mia nevino

Antonia Quijano deziras edziniĝi, ŝi edziniĝu al viro, pri kiu konvena enketo garantiu, ke li eĉ ne scias, kio estas libroj kavaliraj. Kaj se okaze oni eltrovus, ke li konas tiajn verkojn, kaj tamen mia nevino edziniĝos al li, ŝi perdu ĉion, kion ŝi ricevas per ĉi dokumento, kaj la testamentaj administrantoj distribu mian havon por diversaj bonfaraj celoj, laŭ sia bontrovo. *Item* mi suplikas la diritajn sinjorojn administrantojn, ke, se hazarde ili persone konatiĝos kun la aŭtoro laŭdire verkinta la libron, kiu cirkulas ie tie sub la titolo *Dua parto de la faroj de don Quijote de La Mancha*, ili informu lin je mia nomo, plej sincere, ke li pardonu, ke, pro mia kulpo, mi donis al li, kvankam senintence, la okazon skribi tiom da grandaj ekstravagancoj aperantaj en lia libro: ĉar mi forlasas ĉi vivon kun la skrupulo, ke mi inspiris al li la ideon skribi ilin».

Per tio li finis sian testamenton, tuj poste suferis svenon kaj lasis sin fali laŭ sia tuta longo en la lito. La ĉeestantoj, konsternitaj, rapidis lin helpi, sed li vivis ankoraŭ dum tri tagoj atakata de oftaj sinkopoj, meze de la konstanta alarmo de la hejmanoj. Tamen la nevino manĝis, la mastrumantino trinkis, kaj Sancho Panza kontentis, ĉar la legacioj iom viŝas aŭ moderigas en la heredanto la doloron, kiun li nature sentas ĉe la forpaso de persono amata.

Fine alvenis la lasta tago de don Quijote, post ol li ricevis la sakramentojn kaj abomenis kun multaj kaj trafaj argumentoj la librojn kavalirajn.

La aktisto ĉeestis la momenton de lia forpaso kaj diris, ke neniam en la libroj kavaliraj de li legitaj, li renkontis prodon, kiu mortus en sia lito tiel rezignacie kaj kristane kiel don Quijote. Kaj la hidalgo, inter ĉies veoj kaj larmoj, fordonis sian spiriton: mi volas diri, ke li mortis.

Tiam la pastro petis la aktiston, ke li faru dokumenton pri tio, ke Alonso Quijano la bona, ordinare alnomata «don Quijote de La Mancha», forlasis ĉi mondon kaj mortis de natura morto. Li aldonis, ke li deziras la ateston, por eviti, ke alia ajn aŭtoro, escepte de Cide Hamete Benengeli, false revivigu lin kaj verku senfinan historion pri liaj faroj.

Ĉi finon havis la inĝenia hidalgo de La Mancha, kies naskolokon ne volis precize riveli Cide Hamete, por ke ĉiuj vilaĝoj de La Mancha disputu inter si la honoron patri kaj posedi lin, same kiel la sep urboj de Grekio disputis pri Homero. Oni ne parolas ĉi tie pri la larmoj de Sancho, de la nevino kaj de la mastrumantino, kaj ankaŭ ne pri la novaj epitafoj sur la tombo de la hidalgo, kvankam Sansón Carrasco verkis la jenan:

Kuŝas jen la kavaliro
tiel granda laŭ la forto,
ke la tuta mondo vidis,
ke la Mort', per lia morto,
lian vivon ne likvidis.
Super homoj li imponis,
terurante perkuraĝe,
kaj kondukis avantaĝe,
ĉar al ludo li sin donis
vivi fole, morti saĝe.

Kaj la tre prudenta Cide Hamete diris al sia plumo:

—Ho vi, plumo mia, mi ne scias ĉu bone aŭ fuŝe tajlita!
Pendant de ĉi hoko per kupra drato, vi restos ĉi tie kaj vivos
dum longegaj epokoj, se arogantaj kaj friponaj historiistoj ne
dekroĉos vin por vin profani. Sed, antaŭ ol ili vin detirus,
avertu ilin en la plej milda maniero ebla:

For, friponoj, for mi diras!
Mi montriĝas al vi spita,
ĉar ĉi tasko, bona reĝo,
al mi estis rezervita.

»Nur por mi naskiĝis don Quijote, kaj mi por li. Li sciis agi kaj mi skribi, kaj ni du estis fakte unu, malgraŭ la tielnomata aŭtoro el Tordesillas, kiu, per struta plumo krude kaj fuŝe tajlita, aŭdacis skribi, kaj eble skribos denove, pri la faroj de mia kuraĝa kavaliro, kvankam tia tasko estas tro peza ŝarĝo por liaj ŝultroj, kaj la temo tro granda por lia sterila talento. Avertu lin, se okaze vi konos lin persone, ke li lasu ripozi en la tombo la lacajn kaj jam putrajn ostojn de don Quijote, kaj ke li ne portu ilin, kontraŭ ĉiaj leĝoj de la mortoj, al Olda Kastilio,^[436] devigante lin elpaŝi el la ĉerko, kie li kuŝas laŭ sia tuta longo kaj nekapabla fari trian eliron aŭ entrepreni novan aventuron. Liaj du eliroj, tiel laŭde kaj aplaŭde akklamataj, same en la hispanaj kiel en la eksterlandaj regnoj, sufiĉas por ridindigi tiom multe da aventuroj plenumitaj de tiom multe da vagantaj kavaliroj. Tiel vi faros vian devon de bona kristano, donante bonan konsilon al persono deziranta al vi malbonon, kaj mi sentos min fieraj kaj feliĉa esti la unua aŭtoro, kiu ĝuos la plezuron atesti la pozitivan reagon kaŭzitan de lia verko. Ĉar mia sola celo konsistis en tio, inspiri al la homoj disdegnon kaj abomenon kontraŭ la fikciaj kaj absurdaj historioj de la libroj kavaliraj, kies prestiĝo, de kiam aperis la vera rakonto de mia vera don Quijote, komencas ŝanceliĝi kaj sendube baldaŭ disfalos. *Vale.*

[434] Jacopo Sannazaro (1458-1530), napola poeto, fervora imitanto de Vergilio. Lia ĉefa verko estas la poemo en la latina *De partu Virginis*.

[435] Latine: «ankaŭ», «krome», «plie», «plus». Uzata formule en oficialaj dokumentoj, ĉefe en testamentoj.

[436] Hispana regiono. Ĉe la fino de la *Dua parto de don Quijote*, la plagiatisto Avellaneda diras, ke la hidalgo faris novan eliron por vagadi tra Olda Kastilio.

Aneksoj

Dankon

Fernando de Diego dediĉis plurajn jarojn al la tradukado de *Don Quijote*, kiun li finis en 1976.

La hispana familio Manteca-Cano mecenatis la tradukon. Ili donis la komencan kaj decidan impulson al la kiĥoteska tasko aperigi, en la internacia lingvo, la senmortan romanon de Cervantes. En januaro 1977-a, Miguel Manteca López kaj lia edzino donacis la manuskripton de la traduko al Fundación Esperanto.

Víctor Ortiz, patrono de Fundación Esperanto, pagis tiun unuan eldonon de la verko.

José Luis Peralta Medrano, sen scii eĉ unu vorton de Esperanto, linotipe kompostis brile, konsciencie kaj kompetente, la tutan tekston de *Don Quijote* por tiu unua eldono de 1977.

G. Waringhien, L. Knoedt kaj H. Vatré kontribuis per informo pri ĉ. 220 eraroj trovitaj en la eldono de 1977, kiujn Fernando de Diego kompilis kaj publikigis en *Literatura Foiro*.

Miguel Gutiérrez Adúriz antaŭ 2008 iniciatis la bitigon de la traduko, cele al reeldono, organizis laborantaron por retajpado de la originala teksto, kaj mem retajpis parton el ĝi. Krome li dezajnis la novan kovrilon.

Ángel Arquillos López, Luis Eduardo Berdor Remón, Pablo Busto González, Antonio A. Casas Sánchez, Juan Antonio del Castillo Martínez, Ángel García Gutiérrez, Ángel García Santos, Jordi Lietor López, Miguel Ángel Martín Martín,

Fernando Mateos Morán, Lorenzo Noguero Sarasa, Sabino Pelegrín Colomo, kaj José María Salguero retajpis la verkon.

Ana Manero kaj Manolo Parra reviziis la unuan parton de la retajpita teksto.

José Antonio del Barrio kunordigis la bitan reviziitan reeldonon kaj ĝian publikan prezentadon.

Marcos Cruz reviziis la tutan verkon, unuecigis kaj aktualigis la formaton, kaj aranĝis la komputilan programaron por produkti la bitlibron.

Antonio Valén reviziis la lingvajn korektojn kaj solvis la lingvajn dubojn.

Iloj

Ĉi tiu bitlibro estis kreita per jena libera programaro:

- Operaciumo [Raspbian](#) ([Debian](#) adaptita al komputilo Raspberry Pi).
- Interfaco: Grafika fenestro-mastrumilo [Ratpoison](#); terminala fenestro-mastrumilo [GNU Screen](#); perklavara musumilo [keynav](#); klavaro [Dvorak](#).
- Redaktilo [Vim](#) kaj ĝia programlingvo VimL.
- Marklingvo kaj teksto-procezilo [Asciidoctor](#).
- Marklingvo-tradukilo [Pandoc](#) (por la unuaj, provaj versioj) kaj XSLT-procezilo [xsltproc](#) (por la definitiva versio).
- Programlingvo [Forth](#), per [Gforth](#) kaj la biblioteko [Forth Foundation Library](#).
- Bildo-manipulilo [ImageMagick](#).
- Teksto-korektilo [aspell](#).
- Versi-tena sistemo [Git](#).

Historio de versioj

La bita eldono de *Don Quijote* kreskos kaj pliboniĝos. Ĉiu nova versio havos versi-numeron^[437], inklude de internaci-formata dato.

La lastan version ĉiam eblas deŝuti de esperanto.es/quijote. Por klareco, la nomo de la dosiero ĉiam estos *don_quijote_en_esperanto_YYYY-MM-TT.epub*, kie «YYYY-MM-TT» estas la dato de la versio.

Nur publikaj versioj estas enlistigitaj ĉi tie.

1.0.0-rc.6+2016-06-12

Antaŭpretigita por registro sur menditajn komputil-memorilojn ofertotajn dum la 75-a kongreso de Hispana Esperanto-Federacio (en Herrera del Duque, provinco Badaĥozo, de la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio).

1.0.0-rc.13+2016-06-27

Antaŭpretigita por reta distribuo dum la kongreso.

1.0.0+2016-07-01

Unua publika kompleta versio.

[437] Laŭ la normo [Semantic Versioning](#) (semantika versiumo).

Æ

*La ingenia hidalgo
don Quijote de La Mancha*



ANA ESPERANTO-FEDERACIO

HISPA

Miguel de Cervantes

La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha

Enhavo

[Prezento](#)

[Pri la reviziado](#)

[Enkonduko](#)

[La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha](#)

[Prefaco](#)

Al la libro de don Quijote de La Mancha

Urganda, la Nekonata

Amadís de Gaŭlio al don Quijote de La Mancha

Don Belianís de Greklando al don Quijote de La Mancha

SinJORINO Oriana al Dulcinea de El Toboso

Gandalín, ŝildisto de Amadís de Gaŭlio, al Sancho Panza, ŝildisto de don Quijote de La Mancha

De la Spritulo, poeto temo-miksa, al Sancho Panza kaj Rocinante

Rolando freneza al don Quijote de La Mancha

De la Kavaliro de la Suno al don Quijote de La Mancha

De Solisdán al don Quijote de La Mancha

Dialogo inter Babioca kaj Rocinante

Capitro 1

Capitro 2

Capitro 3

Capitro 4

Capitro 5

Capitro 6

Capitro 7

Capitro 8

Capitro 9

Capitro 10

Capitro 11

Capitro 12

Capitro 13

Capitro 14

Capitro 15

Capitro 16

Capitro 17

Capitro 18

Capitro 19

Capitro 20

Capitro 21

Capitro 22

Capitro 23

Capitro 24

Capitro 25

Capitro 26

Capitro 27

Capitro 28

Capitro 29

Capitro 30

Capitro 31

Capitro 32

Capitro 33

Capitro 34

Capitro 35

Capitro 36

Capitro 37

Capitro 38

Capitro 39

Capitro 40

Capitro 41

Capitro 42

Capitro 43

Capitro 44

Capitro 45

Capitro 46

Capitro 47

Capitro 48

Capitro 49

Capitro 50

Capitro 51

Ĉapitro 52

La kongolano, membro de la Akademio de Argamasilla, al la tombo de don Quijote

La regalato, membro de la Akademio de Argamasilla, in *Laudem Dulcinea* de El Toboso

La kapriculo, tre saĝa membro de la Akademio de Argamasilla, laŭde de Rocinante, ĉevalo de don Quijote de La Mancha

La ŝerculo, membro de la Akademio de Argamasilla, al Sancho Panza

La koboldo, membro de la Akademio de Argamasilla, al don Quijote

Tiktako, membro de la Akademio de Argamasilla, ĉe la tombo de Dulcinea de El Toboso

La inĝenia kavaliro don Quijote de La Mancha

Dediço al la grafo de Lemos
Antaŭparolo al la leganto

Capitro 1

Capitro 2

Capitro 3

Capitro 4

Capitro 5

Capitro 6

Capitro 7

Capitro 8

Capitro 9

Capitro 10

Capitro 11

Capitro 12

Capitro 13

Capitro 14

Capitro 15

Capitro 16

Capitro 17

Capitro 18

Capitro 19

Capitro 20

Capitro 21

Capitro 22

Capitro 23

Capitro 24

Capitro 25

Capitro 26

Capitro 27

Capitro 28

Capitro 29

Capitro 30

Capitro 31

Capitro 32

Capitro 33

Capitro 34

Capitro 35

Capitro 36

Capitro 37

Capitro 38

Capitro 39

Capitro 40

Capitro 41

Capitro 42

Capitro 43

Capitro 44

Capitro 45

Capitro 46

Capitro 47

Capitro 48

Capitro 49

Capitro 50

Capitro 51

Capitro 52

Capitro 53

Capitro 54

Capitro 55

Capitro 56

Capitro 57

Capitro 58

Capitro 59

Capitro 60

Capitro 61

Capitro 62

Capitro 63

Capitro 64

Capitro 65

Capitro 66

Capitro 67

Capitro 68

Capitro 69

Capitro 70

Capitro 71

Capitro 72

Capitro 73

Ĉapitro 74
Aneksoj

Dankon

loj

[Historio de versioj.](#)